ESPERANTO EN PERSPEKTIVO

Ĉar la verko ne estas rekompostita, sed tutsimple fotokopiaro de la originala eldono estis necese movi la antaŭparolon ĝis la fino de la libro por povi teni la ordon de la paĝnumeroj, tiel ke vi rapide trovos serĉatan temon.





PS. Kelkaj paĝoj aperas iom oblikvaj. Tio estas ankaŭ en la originala verko.

Legu pri aliaj elektronikaj eldonaĵoj sub

www.kehlet.com

UNUA PARTO

ESPERANTO KIEL SOLVO DE LA LINGVA DEMANDO EN MONDAJ KADROJ

ĈAPITRO 1

LA LINGVA PROBLEMO EN INTERNACIAJ RILATOJ

1.1 KONCIZA HISTORIA TRARIGARDO

1.1.1 Enkondukaj Rimarkoj

Tra la tuta historio de la homaro, ekde la momento kiam du triboj de malsamaj lingvoj ekkontaktis en kiu ajn senco, la lingvaj malfacilaĵoj ne povis ne sentiĝi kiel unu el la ĉefaj obstakloj al reciproka rilatado.

Lasante flanke la primitivan formon de komunikado per gestoj — kaj ankaŭ en nia nuna civilizita mondo eĉ alte edukitaj personoj estas ofte devigataj en fremdaj lingvaj medioj uzi gestojn por esprimi la plej elementajn bezonojn ekde malsato kaj soifo ĝis laceco kaj dormemo — la malfacilaĵo estis solvata, almenaŭ parte, alimaniere. En diversaj historiaj epokoj, sub la influo de samtempaj politikaj kaj kulturaj faktoroj, jen unu jen alia lingvo estis uzata kiel lingvo de oficialaj rilatoj aŭ kiel *lingua franca,* kaj utiligata, ofte dum longaj periodoj kaj sur vastaj teritorioj, kiel helpa rimedo de komunikado inter parolantoj de malsamaj lingvoj kaj dialektoj [1].

La *ĉina* literatura (skriba) lingvo, ekzemple, ludis dum jarcentoj tian rolon kaj plenumas ĝin ĉiam pli efike en niaj tagoj. La *greka koinê,* kiu rezultis el miksaĵo de grekaj lingvoj kaj dialektoj, sed

1. A. Meillet kaj M. Cohen prave diris en sia fama verko *Les Langues du Monde* (Paris 1952), ke ne estas eble trovi konvenan kriterion por distingi inter lingvo, dialekto kaj loka parolformo.

estis ĉefe bazita sur la atika kaj ionia, fariĝis sub Aleksandro la Granda (356-324 a.K.) la oficiala lingvo en la landoj konkeritaj de liaj armeoj. Poste ĝi estis uzata dum multaj jarcentoj kiel komuna helpa lingvo super multnombraj regionaj kaj lokaj dialektoj de Adriatiko ĝis profunde en Azio, de Norda Afriko ĝis la marbordaj regionoj de la Nigra Maro. La greka estis oficiala en la orienta parto de la Romia Imperio kaj poste en Bizanco.

La *latina* havis ankoraŭ pli elstaran pozicion. Origine la lingvo de Latio *(Latium)*, ĝi daŭre riĉiĝadis per elementoj el lingvoj de la venkitaj gentoj. El Romo ĝi etendiĝis al najbaraj teritorioj, poste superregis la aliajn lingvojn de Italio, kaj fine, portata de la romiaj legioj, konkeris la plej grandan parton de la Okcidenta Mondo en tiu epoko. Sennombraj lingvoj kaj dialektoj estis uzataj sur tiu vasta, seninterrompa surfaco de la terglobo, sed super ili troviĝis la oficiala latina: la lingvo de la armeo, administrado kaj juro, de kulturo kaj komerco por la intergentaj rilatoj en la kadro de la Imperio. Kiam en la 5-a jc. la Okcidenta Imperio disfalis sub la venkaj batoj de la invadintoj, ĉesis ankaŭ la funkcio de la latina kiel oficiala ŝtata lingvo, sed la lingvo mem ne malaperis. En formo de la *mezepoka latina* ĝi estis plue uzata kiel komuna lingvo de la privilegiitaj klasoj de feŭda Eŭropo. Ĝi estis la lingvo de la nobelaro, de la eklezio, de la scienco, kulturo kaj diplomatio.

En diversaj historiaj periodoj kaj mondopartoj ankaŭ aliaj lingvoj — ekzemple la *asiria, persa, araba, turka, hispana, portugala, angla, franca, rusa, germana, itala, nederlanda* — havis aŭ plue plenumas similan helpan funkcion.

Ĉiam la koncernaj lingvoj estis aŭ estas apogataj de difinita politika potenco, bazita kutime sur kruda armita forto, sed ne malofte ligita ankaŭ al ekonomia dinamismo kaj al kultura ekspansio. La fakto, ke lingvoj de malsamaj familioj konstante, dum la tuta historio, akiradis kaj perdadis tiun privilegian pozicion, montras klare, ke ilia interna strukturo havas per si mem nenian decidan signifon en tiu ĉi procezo. Principe, kiu ajn lingvo povas ludi tiun rolon aŭ esti relative rapide evoluigita kaj adaptita por ĝin plenumi, kiel pruvas, interalie, ankaŭ la nuntempa konscia kreado kaj evoluigado de komunaj normaj lingvoj en diversaj novaj ŝtatoj, ekzemple en Israelo, Indonezio aŭ S.R. Makedonio (Jugoslavio).

Ŝajnas utile akcenti, ke, ĝenerale parolante, la oficialaj ŝtataj lingvoj estis kaj estas uzataj ĉefe en la limoj de la koncernaj regnoj, kaj multe malpli, eĉ en la kazo de la t.n. „grandaj lingvoj", ekster tiuj kadroj, unuavice en la sferoj de ekonomia, politika kaj kultura influo de la respektivaj potencoj. Tio ne estas menciita

por malgravigi ilian signifon. El vidpunkto de kulturaj interŝanĝoj kaj komunikado, la komunaj helpaj lingvoj estis kaj restas utilaj, sed nur en difinitaj mondopartoj kaj ankaŭ tiam, en tre multaj kazoj, sole por malvastaj sociaj tavoloj. Oni eĉ povas diri, ke en la pasinteco, kiam la internaciaj rilatoj en monda skalo praktike ne ekzistis, aŭ poste, kiam ili nur komencis evolui, tiuj ĉi lingvoj kontentigadis la samtempajn limigitajn bezonojn de komunikado. En Eŭropo la situacio esence ŝanĝiĝis post la malapero de la latina kaj la formiĝo de unuecaj naciaj literaturaj lingvoj — en kelkaj regionoj jam tre frue, en aliaj multe pli poste — en ligo kun la malintegriĝo de feŭdismo kaj la paralela kreiĝo de la nacioj kaj de modernaj naciaj ŝtatoj aŭ multnaciaj federacioj. La lingva problemo fariĝis ekstreme grava en la epoko, kiun ni mem travivas, kaj ĝi plue akriĝas de jaro al jaro. J. L. Vives vizie antaŭvidis la nunan situacion, kiam li skribis en sia verko *De disciplinis* en 1532:

> „Estus feliĉo, se ekzistus unusola lingvo, kiun povus utiligi ĉiuj popoloj.... La latina malaperos; tiam ekregos granda konfuzo en ĉiuj sciencoj, kaj la popoloj vivos en profunda izoliteco...."

1.1.2 La Latina kaj Franca Precedencoj

El vidpunkto de internaciaj rilatoj en Eŭropo la *mezepoka latina* havis tute specialan signifon. Ĝi estis en la komenco la sola lingvo, kiun oni scipovis skribi, ĉar nur poste la franca, hispana, itala, angla kaj aliaj lingvoj ricevis literaturan formon. Interalie, la latina estis la lingvo de diplomatio kaj ĝi estis uzata ne nur skribe, sed ankaŭ parole, kiam ajn la partioj ne konis la lingvojn unu de la alia.

La grandaj ŝanĝoj en la ekonomia, socia kaj politika strukturo de Eŭropo, rapidigitaj per la malkovro de Ameriko, reflektiĝis ankaŭ en la spirita vivo de la tiama mondo, kaj la pozicioj de la latina komencis ŝanceliĝi. Komence de la 16-a jc. la Reformacio donis al ĝi fortan baton en la eklezio, dum la anstataŭigo de la feŭdisma disrompiteco per grandaj unuecaj centralismaj ŝtatoj kaŭzis ĝian laŭgradan malaperadon el diplomatio kaj ĝenerale desur la scenejo de internaciaj rilatoj. Post la Traktatoj de Vestfalio (1648) komenciĝis la descendo de tiu lingvo kaj la ascendo de la franca. En Vestfalio la diplomatoj ja povis ankoraŭ kompreni la latinan, sed multaj ne plu kapablis ĝin paroli. En Rastatt (1714) kelkaj reprezentantoj jam devis utiligi la servojn de interpretistoj por interkompreniĝi. Oni ankaŭ komencis prononci la lingvon en malsamaj manieroj, kio siavice kontribuis al finiĝo de ĝia rolo kiel internacia instrumento de

komunikado.

Dum la tuta 18-a jc. la *franca* havis ĉiam pli grandajn sukcesojn. En Ruslando jam Petro la Granda favoris kaj uzis tiun lingvon. Katarina la Dua entreprenis veran kampanjon por francigi la regantajn tavolojn de sia Imperio. Tuta armeo da instruistoj de la franca lingvo, da francaj artistoj kaj teknikistoj invadis la kulturajn centrojn de Ruslando. Ekde 1756 en Peterburgo funkciis konstanta franca teatro. La „bone edukitaj personoj" hontis paroli ruse kaj la infanoj de la aristokratio apenaŭ ĝin scipovis. La reago de la granda rusa sciencisto M. V. Lomonosov (1711-1765), kiu estas rigardata kiel la fondinto de la moderna rusa literatura lingvo, kaj la pozitivaj efikoj de tiu reago je la posta evoluo de la rusa, sentiĝis ĉiam pli forte interne de la lando, sed en siaj eksteraj rilatoj la Rusa Imperio plue uzadis preskaŭ ekskluzive la francan. Eĉ la instrukcioj al la rusaj imperiaj diplomatoj en eksterlando estis redaktataj en la franca.

La franca disvastiĝis rapide ankaŭ en aliaj landoj, precipe en Germanio, Nederlando, Skandinavio, Pollando, sed, kompreneble, nur inter la kleruloj. En Germanio la penetro de la franca estis tiel vasta, ke jam fine de la 17-a jc. Leibniz plendis pro ĝia superrego je la kosto de la germanaj lingvo kaj kulturo. Cent jarojn poste, en 1780, Frederiko la Dua, kiu ne nur parolis france, sed estis ankaŭ saturita de la franca kulturo, ridindigadis la klopodojn de Lessing forigi la francan influon el Germanio, kaj asertadis, ke la franca lingvo estas la ŝlosilo, kiu malfermas la pordon de la tuta mondo. Simile esprimas sin ankaŭ hodiaŭ la rondoj, kiuj pledas por tiu aŭ alia nacia lingvo kiel rimedo por internacia komunikado. Tamen, ankaŭ en la kazo de Germanio la ideoj de Lessing, reflektantaj la kreskantan signifon de la naciaj lingvoj por la formiĝo de la nacioj en la moderna senco de la vorto kaj por la konservo de la nacia identeco, venkis la konceptojn de la monarko.

En Anglio la rezisto kontraŭ tiu ondo de francigo estis forta ekde la komenco. Tre probable la unua incidento tiurilate okazis en la jaro 1753. En traktadoj por ordigo de malkonsento koncerne prezon, la francaj komisiitoj resendis al la britaj reprezentantoj ilian memorandon, ĉar ĝi estis skribita en la angla lingvo, kaj postulis, ke la tuta negocado okazu en la franca. Ili asertis, ke la privilegia pozicio de la franca estis ankaŭ jure establita per longa uzado en la diplomatia praktiko. La Brita Registaro sendis al siaj reprezentantoj en Parizo instrukciojn, en kiuj ĝi deklaris, ke pro ĝentileco ĝi ĉiam aldonis al la anglalingvaj memorandoj francan tradukon, sed ke la francaj komisiitoj trovis erarojn en la vort-

umo. Tial la anglaj komisiitoj ricevis la ordonon uzi estontece nur la anglan. Ĉar nun Francio postulas la uzon de la franca kiel rajton, la Brita Registaro opinias, ke akcepti tiun uzon en tiaj kondiĉoj efektive signifus krei precedencon kaj rekoni la uzon de la franca kiel rajton. En la dokumento troviĝis jena interesa parto:

> Ĉiuj nacioj havas la rajton reciproke rilati en neŭtrala lingvo. Kiel tia, la franca estas uzata en la rilatoj kun la princoj de la Imperio kaj kun aliaj Potencoj; se la Kortego de Versailles opinias oportuna trakti kun Lia Majesto en la latina, la Reĝo volonte konsentos.... La Reĝo eksplicite ordonas, ke vi ne akceptu en la estonteco kiun ajn dokumenton de la francaj komisiitoj en ilia propra lingvo, krom se ili devigas sin ricevi la respondon en la angla [2].

La francaj komisiitoj provis konservi la pozicion de sia lingvo per deklaro, ke la uzo de la franca ne estos konsiderata kiel precedenco, sed Britio restis firma. Estas menciinde, ke oni perdis preskaŭ la tutan jaron 1753 por tiu lingva diskuto.

La imuneco de Anglio kontraŭ la ofensivo de la franca en la 18-a jc. ŝuldiĝas ĉefe al la fakto, ke ĝi formiĝis kiel nacio kun sia propra unueca literatura lingvo pli frue ol la aliaj grandaj nacioj de Eŭropo, kaj ke tiu lando ĝustatempe komprenis la grandan politikan kaj kulturan signifon de la lingvo uzata en interŝtataj rilatoj. Fine de la 18-a jc. la angla siavice troviĝis en plena ekspansio. En la 19-a jc. la kreskanta politika influo de Usono fariĝis grava faktoro en la fortikigo de la pozicioj de tiu lingvo.

Kvankam la franca neniam atingis la universalecon de la latina, tamen ĝi sendube ĝuis regantan pozicion ne nur en la oficialaj interŝtataj rilatoj dum du jarcentoj, sed ankaŭ kiel lingvo de kulturaj kaj komercaj interŝanĝoj en multaj mondopartoj.

Tiu ĉi fakta elstara pozicio de la franca kreis la opinion, ke ĝi estis ankaŭ jure rekonita kiel la oficiala lingvo de diplomatio ĝis la Unua Mondmilito. Francio mem en pluraj okazoj insistis pri tiu kvazaŭa jure rekonita „rajto" de la franca, sed gravaj dokumentoj pruvas precize la malon. La Traktato de Aachen (1748) estis redaktita en la franca, sed aparta artikolo eksplicite precizigis, ke la uzo de la franca neniel prejudicas la rajton de la kontraktantaj partioj havi kopiojn en aliaj lingvoj. Similajn klaŭzojn entenis la Traktato de Parizo de 1763, la Traktato de Versailles de 1783 kaj la Fina Akto de la Viena Kongreso (1815).

2. Laŭ E. Satow, *A Guide to Diplomatic Practice*. 3-a eld., reviziita de H. Richtie. London-New York-Toronto 1932, p. 54.

Tiu lasta aparte emfazis, ke la uzo de la franca ne havos kiun ajn sekvon por la estonteco kaj ke ĉiu el la Potencoj rezervas la rajton utiligi en la estontaj traktadoj kaj konvencioj la lingvon uzitan antaŭe en la diplomatiaj rilatoj, tiel ke la Viena Traktato ne povos esti citata kiel ekzemplo kontraŭa al la establitaj kutimoj.

La rezervoj rilate la uzon de la franca klare indikas, ke ĝi neniam akiris la pozicion de jure rekonita oficiala lingvo de interŝtataj rilatoj. Male, la latina estis dum jarcentoj senrezerve uzata kiel la sola lingvo de diplomatiaj rilatoj. Ĝuste tial, kiam oni komencis apliki la francan, necesis emfazi, ke tio prezentas escepton „kontraŭ la kutimoj regule observataj en la traktatoj" kaj ke la uzo de la franca ne povos esti interpretata kiel kreanta kiun ajn „rajton" por la franca.

La malsameco rilate la internacian pozicion de la du lingvoj estas logika sekvo de ilia socia kaj politika karaktero. La mezepoka latina ne estis nacia, sed klasa lingvo, komuna al la regantaj tavoloj de ĉiuj eŭropaj landoj. Aplikante la latinan por siaj reciprokaj rilatoj, ili efektive uzis *sian* lingvon kaj ne iun fremdan. Eĉ post la formiĝo de la grandaj naciaj lingvoj, la latina plue prezentiĝis kiel neŭtrala lingvo, kiu neniel ofendis la naciajn sentojn de kiu ajn ŝtato. Kontraŭe, la franca kiel nacia lingvo de potenca ŝtato, estis senigita de tiu grava eco. Jure rekoni tian nacian, do politike neneŭtralan, lingvon kiel oficialan por la interŝtataj rilatoj ne nur kontraŭus la principon de suverena egaleco, sed ankaŭ donus konsiderindajn avantaĝojn al la nacio de la privilegiita lingvo. Ju pli konkrete estabiĝadis la nacio en etna senco, ju pli firmiĝadis la ideo de nacia ŝtato kaj la koncepto de nacia suvereneco, kiu anstataŭigadis ĉiam pli tiun de la suvereneco de la monarko, des pli malgrandaj fariĝadis la ŝancoj ne nur de la franca, sed de kiu ajn nacia lingvo daŭre ekokupi la pozicion de komuna helpa lingvo en la internaciaj rilatoj.

1.1.3 Angla-Franca Kunregado en la Ligo de Nacioj

Post la finiĝo de la Unua Mondmilito la angla, kiu jam estis atinginta rimarkindan disvastiĝon, sukcesis doni decidan baton al la privilegia pozicio de la franca. La klopodoj de Francio konservi por la franca monopolon komplete malsukcesis. Britio kaj Usono insistis pri egala uzo de la angla kaj, post longaj diskutoj, fine venkis la tezo de angla-franca kunregado. La Traktato de Versailles de 1919, kiu entenis la Pakton de la Ligo de Nacioj (art. 1-26 de la Traktato de Versailles), estis redaktita en la franca kaj angla. Art. 440 de tiu Traktato preskribis, ke „la tekstoj franca kaj angla estos aŭtoritataj". Kompreneble, la sama principo validis por la Pakto de la Ligo de

Nacioj, kiu estis enkorpigita en la Traktato.

La Regularo de la 30-a de novembro 1919 antaŭvidis, ke la Ligo de Nacioj ne havos „oficialan lingvon", sed ke ĝi uzos la du „kutimajn lingvojn", nome la francan kaj anglan. Estis ankaŭ antaŭvidite, ke ĉiu ŝtato havos la rajton uzi sian propran lingvon, kondiĉe ke ĝi mem prizorgu la tradukon en „unu el la kutimaj lingvoj". Laŭ la Interna Regularo de la Asembleo, ĉiu parolado en la franca devis esti resumita en la angla, kaj inverse. Ĉiuj oficialaj dokumentoj estis publikigitaj en la du lingvoj. La samaj principoj aplikiĝis al la komisionoj de la Asembleo, al la Konsilo de la Ligo, al la Sekretariato, entute al ĉiuj organoj. Kvankam la Pakto kaj la internaj regularoj estis plurfoje ŝanĝitaj, tamen la priskribita lingva situacio restis netuŝita dum la tuta ekzistado de la Ligo de Nacioj.

La situacio en la Ligo neniel influis la uzon de aliaj lingvoj por oficialaj kaj neoficialaj internaciaj rilatoj. Efektive, la ĝenerala situacio inter la du militoj povas esti karakterizita per provizora angla-franca kompromiso en la Ligo de Nacioj, sen kreo de precedenco por la estonteco aŭ de kiu ajn jura rajto aŭ devo ekster la kadroj de la Ligo; per kolektivaj traktatoj kutime en la angla kaj franca, kaj duflankaj traktatoj ĉiam pli ofte en la lingvoj de la kontraktantaj partioj; per klopodoj de aliaj pli grandaj nacioj havigi al siaj respektivaj lingvoj privilegian pozicion identan aŭ similan al tiu, kiun ĝuis la angla kaj franca; per apliko de diversaj aliaj naciaj lingvoj kiel helpaj rimedoj de komunikado en la sferoj de intereso de la koncernaj grandpotencoj. Rezulte, intensiĝis la lukto sur la internacia lingva kampo. La evoluprocezo, iniciatita en Versailles, necese kondukis al la nuna ĥaosa lingva situacio sub la reĝimo de Unuiĝintaj Nacioj.

1.2 NUNA SITUACIO

1.2.1 Oficialaj kaj Laboraj Lingvoj

La Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri la Internacia Organizacio okazis en San-Francisko de la 25-a de aprilo ĝis la 26-a de junio 1945. En la momento de la komenciĝo ne ekzistis ia ajn interkonsento koncerne la lingvojn uzotajn de la Konferenco. Tiurilate la situacio estis simila, sed ne identa, al tiu de Versailles: en 1919 Francio proponis, ke la franca estu la sola oficiala lingvo de la Packonferenco; en 1945 la ĉefo de la usona delegacio rimarkigis tuj en la komenco, ke la debatoj en la plenaj kunsidoj devus esti kondukataj en la angla kun posta traduko en la francan, ĉar tio ŝparus tempon; en Versailles la brita delegacio forte kontraŭstaris la francan proponon kaj postulis

egalecon por la angla; en San-Francisko la ĉefo de la franca delegacio same energie rifuzis la usonan sugeston kaj insistis pri egala rajto por la franca. En la vigla diskuto pri la lingva demando, la ĉefo de la ĉina delegacio esprimis la opinion, ke la angla devus esti uzata kiel „labora lingvo". Ŝajnas, ke li estis la unua, kiu uzis tiun esprimon. Fine oni decidis, ke la angla, ĉina, hispana, franca kaj rusa estos la oficialaj lingvoj de la Konferenco, dum la angla kaj franca estos uzataj kiel laboraj lingvoj. Tiamaniere formiĝis la distingo inter „oficialaj" kaj „laboraj" lingvoj.

La Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj (UN) leĝigis la novan situacion rilate la oficialajn lingvojn en Art. 111, kiu preskribas, ke la tekstoj de la Ĉarto en la 5 menciitaj lingvoj estas egale aŭtentikaj.

Rilate la laborajn lingvojn ne estis farita ia definitiva decido. La Prepara Komisiono, elektita en San-Francisko por organizi la Unuan Sesion de la Ĝenerala Asembleo, proponis, ke la lingvaj reguloj de San-Francisko restu validaj ĝis oni decidos alie. Tiu formulo malfermis la pordon por novaj diskutoj pri la lingva demando. La problemo estis pridiskutita en la Unua Komisiono de la Ĝenerala Asembleo, okazinta en Londono komence de 1946. La Komisiono proponis rezolucion al la Ĝenerala Asembleo, kiu unuanime akceptis ĝin la 1-an de februaro 1946 kune kun aldono enhavanta en 9 punktoj la novajn lingvajn regulojn. Laŭ tiu aldono la ĉefaj reguloj estas:

En ĉiuj organoj de UN, kun la escepto de la Internacia Kortumo, la oficialaj lingvoj estas la ĉina, angla, franca, rusa kaj hispana. La angla kaj franca estas la solaj laboraj lingvoj. Ĉiu parolado eldirita en unu el la laboraj lingvoj devas esti interpretita en la alia. La paroladoj faritaj en unu el la 3 ceteraj oficialaj lingvoj devas esti interpretitaj en ambaŭ laboraj. Ĉiu reprezentanto rajtas paroli en kiu ajn neoficiala lingvo, sed en tiu ĉi kazo li mem devas prizorgi la tradukon en unu el la laboraj lingvoj, dum la Sekretariato havas la taskon prizorgi la interpretadon en la alia labora lingvo. La raportoj devas esti establitaj en la du laboraj lingvoj, sed kompleta aŭ parta traduko en kiun ajn el la aliaj oficialaj lingvoj devas esti farita je postulo de kiu ajn delegacio. La protokoloj devas esti ellaboritaj kiel eble plej baldaŭ en ĉiuj oficialaj lingvoj. Same tiel la rezolucioj kaj aliaj gravaj dokumentoj devas esti publikigitaj en la oficialaj lingvoj, sed kiu ajn delegacio rajtas postuli, ke ankaŭ aliaj dokumentoj aperu en kiu ajn aŭ en ĉiuj oficialaj lingvoj.

El tiuj principoj klare vidiĝas la malsama pozicio de la oficialaj kaj laboraj lingvoj. La lingvaj reguloj akceptitaj la 1-an de februaro 1946 eniris poste en la internajn regularojn de ĉiuj organoj de UN, kun la escepto de la Internacia Kortumo, kiu ĝis hodiaŭ konservas nur la anglan kaj francan kiel oficialajn lingvojn kaj kiu aplikas

aliajn regulojn de interpretado. La samaj principoj establitaj por Unuiĝintaj Nacioj validas ankaŭ por la t.n. specialigitaj organizaĵoj apartenantaj al la familio de UN (ekzemple Unesko, Monda Organizaĵo pri Sano k.a.), sed ofte kun gravaj devojiĝoj.

Unu el la bazaj principoj de UN estas tiu de suverena egaleco de ĉiuj Ŝtatoj-Membroj. Efektive, la lingvaj reguloj de San-Francisko grave malobservas la principon de egaleco, ĉar ili klasigas la lingvojn laŭ tri kategorioj: laboraj, oficialaj kaj ĉiuj aliaj. La formulo „oficialaj-laboraj lingvoj" signifis faktan superregon de la angla kaj franca, kaj tial entenis ĝermojn de malkontento.

1.2.2 Plia Komplikiĝo de la Problemo

Jam fine de 1947 komenciĝis la atakoj kontraŭ la unuanime akceptita nova sistemo. La hispane parolantaj nacioj postulis por sia lingvo la pozicion de labora. La Sekretariato tuj atentigis, ke la akcepto de la propono kostus al UN pli ol unu milionon kaj ducent mil dolarojn jare. En la diskuto evidentiĝis, ke la hispana estis maljuste traktata ankaŭ kiel oficiala lingvo. La argumentoj kaj kontraŭargumentoj pri la hispana kiel labora lingvo fariĝis preskaŭ modelo por ĉiuj postaj diskutoj pri la lingva demando ne nur en diversaj organoj de UN aŭ de specialigitaj organizaĵoj, sed ankaŭ ekster la kadro de UN. La apogantoj de iu lingvo kutime akcentas la nombron da personoj parolantaj la koncernan lingvon, laŭdas ĝiajn kvalitojn kaj kulturan valoron, klopodas prezenti la avantaĝojn, kiujn la adopto de tiu lingvo donos por la progresigo de la celoj kaj idealoj de UN aŭ de alia organizaĵo; la oponantoj ĉiam volonte rekonas la kulturan signifon de la proponita lingvo, sed kontraŭstaras ĝian adopton ĉefe pro la altegaj financaj ŝarĝoj kaj pro teknikaj malfacilaĵoj. Kvankam tiuj argumentoj kaj kontraŭargumentoj estas grandparte ĝustaj, tamen ili maskas la plej profundajn radikojn de la lingva batalo, nome la politikan prestiĝon kaj la sennombrajn aliajn avantaĝojn, kiujn donas la privilegia pozicio de iu nacia lingvo por la respektivaj ŝtatoj je malavantaĝo de ĉiuj aliaj.

La demando de la hispana longiĝis ĝis la fino de 1948, kiam la Ĝenerala Asembleo devis cedi kaj decidis, ke la hispana fariĝu labora lingvo de tiu organo. Jam tiam la soveta delegacio denove insistis, ke ankaŭ la ĉina kaj rusa havu egalan pozicion, ĉar alie tio signifus gravan diskriminacion. En 1949 ekflamis novaj diskutoj, ĉi-foje rilate la ĉinan kaj precipe la rusan. Ne povante trovi kontentigan solvon, la Ĝenerala Asembleo decidis prokrasti la aferon.

En 1952 la lingva batalo revigliĝis en ligo kun la propono de kelkaj hispane parolantaj landoj, ke la hispana fariĝu labora lingvo ankaŭ

de la Ekonomia kaj Socia Konsilo. Pollando kaj Ĉinio tuj faris aldonan proponon, ke la rusa kaj ĉina same tiel fariĝu laboraj lingvoj de tiu organo. La Sekretariato plian fojon atentigis pri la grandegaj kostoj: 534.000 dolaroj por la hispana, 645.000 dolaroj por la rusa kaj 900.000 dolaroj por la ĉina, se la tri lingvoj fariĝus laboraj en la Ekonomia kaj Socia Konsilo. Aliflanke, ankoraŭfoje montriĝis, ke ankaŭ la reguloj pri la uzo de la oficialaj lingvoj — tute speciale de la ĉina — estis grave malobservataj. Post longaj diskutoj la Ĝenerala Asembleo decidis la 5-an de decembro 1952, ke la hispana fariĝu plia labora lingvo de tiu organo, sed ankoraŭfoje malakceptis la rusan kaj ĉinan.

Alia aparte menciinda lingva diskuto, ĉi-foje precipe inter la angla kaj franca kiel laboraj lingvoj, okazis en 1966 kaj 1967. La france parolantaj nacioj energie protestis pro la absolute nekontentiga fakta pozicio de la franca kiel labora lingvo. Fine de 1966 la delegacioj de ĉiuj france parolantaj landoj vizitis la Ĝeneralan Sekretarion de UN (U Thant) kaj postulis, ke la franca, kiel unu el la oficialaj kaj laboraj lingvoj de UN, ĝuu en la praktiko de UN la jure rekonitan pozicion. En la Asembleo mem aŭdiĝis akraj riproĉoj pro la malatentado de la franca en la Sekretariato, kaj postuloj pri „justeco" por tiu lingvo. Rezulte de tiu premo la Ĝenerala Asembleo decidis per du rezolucioj, ke la Sekretariato atentu je pli justa uzo de la laboraj lingvoj kaj establu pli bonan ekvilibron inter tiuj lingvoj en la nomado de la oficistaro. Fine de 1967 okazis nova lukto pri la pozicio de la franca. Ĝi finiĝis per granda plimulto favore al lingva ekvilibro en la Sekretariato. La Ĝenerala Sekretario estis samtempe komisiita rapidigi apartan programon de lingvoinstruado por la oficistaro de UN kaj stimuli la lernadon per specialaj krompagoj por la oficistoj kiuj kapablas uzi du laborajn lingvojn.

Paralele kun la prezentita angla-franca duelo, kiu ripetiĝis en 1968, fine de 1968 Soveta Unio kaj ĝiaj apogantoj lanĉis novan atakon por la rusa kiel labora lingvo — ĉi-foje kun sukceso.

Kiel kutime, nombro da reprezentantoj parolis pri la graveco de la rusa por komunikado en la sferoj de diplomatio kaj scienco, kaj pri la dezirindeco akcepti la rusan kiel laborlingvon ankaŭ pro politikaj kaj praktikaj motivoj. La oponantoj precipe emfazadis la financajn ŝarĝojn. La reprezentanto de Usono insistis, ke efikeco kaj ekonomiaj konsideroj devas esti la solaj kriterioj por akcepto de kiu ajn lingvo kiel labora por kiu ajn organo. Argumentoj kaj kontraŭargumentoj viciĝis laŭ la du linioj. La 21-an de decembro 1968 oni fine akceptis la proponon, ke la rusa fariĝu plia labora lingvo de la Ĝenerala Asembleo. Krome, en la sama rezolucio, la Ĝenerala Asembleo esprimis la dezirindecon, ke la rusa kaj hispana fariĝu laboraj

lingvoj ankaŭ de la Konsilo de Sekureco. Laŭ la oficialaj taksoj, la elspezoj por la rusa kiel plia labora lingvo de la Ĝenerala Asembleo estas proksimume du milionoj da dolaroj jare. La menciita intensa lingvoinstruado por la oficistaro kostas proksimume pliajn sepcent mil dolarojn jare laŭ la taksoj fine de 1968.

Kiel oni vidas, en la sfero de oficialaj interŝtataj rilatoj la lingva problemo fariĝis kaj plue fariĝas ĉiam pli kompleksa. Por bone kompreni la fenomenojn en la naturo kaj en la socio, oni devas rigardi ilin ne kiel senmovajn statojn, sed kiel evoluprocezojn. La dinamismo sur la lingva kampo klare evidentigas daŭran akriĝadon de la problemo. La fina akto de la Viena Kongreso en 1815 estis redaktita en unusola lingvo; en Versailles en 1919 oni uzis du lingvojn; en la Pariza Packonferenco de 1946 estis tri lingvoj. La Ligo de Nacioj havis fakte du oficialajn lingvojn, UN havas kvin, la Ĝenerala Konferenco de Unesko ok, kaj povas rekoni tiun pozicion ankaŭ al aliaj. En UN estis en la komenco du laboraj lingvoj, poste tri, nun estas kvar kaj tre verŝajne baldaŭ estos kvin, tiel ke malaperos la diferenco inter la oficialaj kaj laboraj lingvoj. En Unesko estis unue du laboraj lingvoj, la franca kaj la angla, poste devis esti aldonita la hispana, sekvis la rusa kaj fine la araba, tiel ke nun la Ĝenerala Konferenco jam havas kvin laborajn lingvojn, sed en difinitaj kazoj ĝi povas havi eĉ ses. Simila tendenco manifestiĝis ankaŭ en aliaj interŝtataj organizaĵoj en la familio de UN. La Organizaĵo de UN por Nutraĵo kaj Agrikulturo (FAO) eĉ nuligis la distingon inter oficialaj kaj laboraj lingvoj. Dum la sesio de oktobro 1968, la Konsilo de tiu Organizaĵo ekzamenis la demandon de lingvoj utiligataj de FAO kaj la Programkomitato konstatis, ke fakte ne plu eblas distingo inter „oficialaj lingvoj" kaj „laboraj lingvoj". Nun tiu Organizaĵo utiligas por diversaj organoj aŭ celoj la anglan, hispanan, francan, germanan. Eĉ organizaĵoj, kiuj ankoraŭ distingas inter la du kategorioj de lingvoj, uzas por siaj publikaĵoj ankaŭ lingvojn, kiuj estas nek oficialaj, nek laboraj. Ekzemple, ILO (Internacia Labor-Organizaĵo) utiligas tiucele la araban, danan, anglan, finnan, francan, germanan, hindan, japanan, norvegan, hispanan, rusan, svedan kaj urduan. La konata *Unesko-Kuriero* estas nun (1973) publikigata en la angla, franca, hispana, rusa, germana, araba, japana, itala, hinda, tamila, hebrea, persa, nederlanda, portugala kaj turka.

En la eŭropaj institucioj la lingva situacio prezentiĝas alimaniere. Ĝis la 1-a de januaro, 1973, la oficialaj lingvoj de la Eŭropa Komunaĵo estis la franca, germana, itala kaj nederlanda, sed en la praktiko la franca fakte ĝuis privilegian pozicion. La 1-an de januaro, 1973, aliĝis pliaj tri ŝtatoj kaj ankaŭ iliaj lingvoj fariĝis oficialaj. Tio eĉ pli komplikas la lingvan situacion.

1 LA LINGVA PROBLEMO EN INTERNACIAJ RILATOJ

En aliaj interŝtataj kaj internaciaj privataj organizaĵoj la oficialaj lingvoj tre varias. El 680 internaciaj organizaĵoj, kies oficialaj lingvoj estas indikitaj en la Jarlibro por 1962-63 de la Unio de Internaciaj Asocioj, 164 havis nur unu oficialan lingvon, 225 havis du lingvojn, 199 tri lingvojn, 53 uzis kvar lingvojn, 31 utiligis kvin lingvojn, 4 organizaĵoj havis ses oficialajn lingvojn kaj 4 aliaj sep. Pli kompleta statistiko, publikigita en la revuo *Associations Internationales*, n-ro 12/1960, montras, ke el 1.206 internaciaj interŝtataj kaj privataj organizaĵoj nur 381 havas unusolan lingvon kiel oficialan, 346 havas du oficialajn lingvojn, 248 uzas tri, 147 havas kvar oficialajn lingvojn, 58 utiligas kvin, 15 oficialigis ses lingvojn kaj 11 organizaĵoj havas sep aŭ pli da oficialaj lingvoj. Inter la organizaĵoj, kiuj nun (1972) havas nur unu oficialan lingvon, menciindaj estas la 28 internaciaj organizaĵoj, en kiuj la sola oficiala lingvo estas Esperanto. Laŭ alia statistiko publikigita en la sama periodaĵo, el ĉiuj enketitaj organizaĵoj la angla estas oficiala en 943, la franca en 920, la germana en 399, la hispana en 253, la itala en 110, la rusa en 41, la nederlanda en 43, la portugala en 42, aliaj lingvoj en 358 organizaĵoj. Tiuj aliaj lingvoj estas la araba, ĉina, dana, Esperanto, hebrea, japana, latina, hungara, norvega, pola, serba aŭ kroata, slovena k.a.

Necesas aldoni, ke la lingva situacio rapide ŝanĝiĝas. Lingvoj, kiuj estis oficialaj en iuj organizaĵoj antaŭ kelkaj jaroj, kelkfoje perdas tiun rolon, dum aliaj akiras ĝin. Tial ankaŭ la statistikoj pri la uzo de lingvoj en internaciaj organizaĵoj perdas sian valoron post kelka tempo. La supraj informoj, rilatantaj ĉefe al la periodo 1960-1963, verŝajne ne plu estas tute ĝustaj por la situacio en 1972, sed ili en ĉiu okazo evidentigas la konsiderindan nombron da lingvoj uzataj en oficialaj kaj neoficialaj internaciaj rilatoj.

Similan bildon prezentas la lingva situacio en la sferoj de internacia komunikado ekster la oficialaj aŭ neoficialaj internaciaj organizaĵoj. La lingvaj baroj sentiĝas ĉiam pli forte ankaŭ sur la kampo de ĉiaspecaj kulturaj interŝanĝoj, scienca komunikado, komerco, turismo, praktike ĉie. Ju pli grandaj la teknikaj eblecoj por kontaktoj inter grupoj aŭ individuoj apartenantaj al malsamaj lingvaj komunaĵoj, des pli evidentiĝas la lingvodiverseco kiel obstaklo.

Fine, interne de unuopaj landoj, unuavice en multnaciaj ŝtatoj, la lingva demando ofte kaŭzas ĉiaspecajn malfacilaĵojn. Kelkfoje ili transformiĝas en akrajn politikajn batalojn. La altrudado de unu tutŝtata nacia lingvo kontraŭ la interesoj de la naciaj malplimultoj elvokas streĉitecojn kaj konfliktojn; aliflanke, egala traktado de ĉiuj lingvoj en la edukado kaj en la publika vivo necese postulas grandegajn elspezojn kaj malhelpas la efikecon de la administrado. Praktike,

hodiaŭ ne ekzistas unusola ŝtato en la mondo, kiu ne spertus la lingvan problemon en unu aŭ alia formo.

1.3 DIVERSAJ ASPEKTOJ

La lingva problemo en la nuntempaj internaciaj rilatoj havas plurajn aspektojn, el kiuj la plej gravaj estas la teknike-lingva, socia, psikologia, jura-politika kaj ekonomia.

1.3.1 Teknike-Lingva Aspekto

El pure teknike-lingva vidpunkto la problemo havas multajn facetojn, kies komuna fono estas la malfacileco plene ekregi kiun ajn nacian lingvon. En 1962 s-ro A. Woodburn, membro de la Brita Parlamento, sugestis la kreon de Komuna Eŭropa Lingvo, kies vortaro devus konsisti unuavice el la jam internaciiĝintaj vortoj. Efektive, li proponis krei ion, kio esence jam ekzistas en la formo de la Internacia Lingvo (Esperanto). La brita parlamentano formulis sian ideon en leĝpropono, por kiu li pledis antaŭ la Brita Parlamento la 28-an de februaro 1962. En sia parolado li mem akcentis la grandan malfacilecon de la angla. La parolata angla — li diris — konsistas el 40 malsamaj sonoj, sed ekzistas pli ol 2.000 diversaj manieroj literumi ilin. Tio similas al la ĉina skribo, kiu konsistas el 50.000 signoj, sed nuntempe ĉ. 4.000 estas ĝenerale uzataj. Kaj kion diri pri la rusa kun la multnombraj kazoj kaj deklinacioj, aŭ pri la franca kun ĉiuj eblaj finaĵoj por la konjugacio de la verboj, aŭ pri kiu ajn alia nacia lingvo! La fakto, ke ĉie en la mondo oni studas siajn proprajn naciajn lingvoj dum multaj jaroj en la lernejoj, montras pli ol klare ĝis kiu grado ili estas malfacilaj. Tio kaŭzas, ke relative tre malgranda nombro da personoj ekregas kontentige fremdajn naciajn lingvojn.

Kiam pluraj lingvoj estas oficiale uzataj, pro la strukturaj malsamecoj de tiuj lingvoj ofte ekestas problemo kiel esprimi en la traduko precize la ideon de la originalo. Mistradukoj kaj miskomprenoj abundas, kvankam la plej gravaj organizaĵoj kutime disponas pri unuarangaj tradukistoj kaj interpretistoj. Ne estas eble doni ĉi tie ekzemplojn, ĉar ili estas tiel multnombraj, ke pluraj centoj da paĝoj apenaŭ sufiĉus por prezenti ilin plej koncize. Sufiĉos mencii, ke eĉ la nomo mem de la plej grava organizaĵo de la hodiaŭo ne estas la sama en la rusa kaj en la angla aŭ franca. En la angla kaj franca aŭtentikaj tekstoj ĝi nomiĝas „Unuiĝintaj Nacioj", sed en la rusa same aŭtentika teksto la nomo estas „Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj". Se tio okazis en la plej grava dokumento de la nuntempa mondo kaj en kondiĉoj, kiuj permesis al la tradukistoj pripensi la

tradukotan esprimon, oni povas facile imagi la erarojn kiam temas pri rapida tradukado aŭ interpretado de unu lingvo al alia dum internaciaj konferencoj. Se la tradukado estas konsekutiva (sinsekva) kaj se la interpretisto anticipe ricevas la tekston, la traduko kutime estas kontentiga. Male, se la interpretado estas simultana (samtempa), la eraroj pli ol abundas kaj kutime necesas korekti ilin poste en la skribaj dokumentoj [3]. La problemo komplikiĝas, se la delegitoj ne scias sufiĉe bone la lingvon, en kiu ili devas paroli. La interpretistoj ofte troviĝas en granda embaraso pro la simpla kaŭzo, ke ne estas eble kompreni iun delegiton, ĉar li ne scias la lingvon devige uzatan. Eĉ okazis, ke interpretisto diris en la fino: „Tio ĉi estas la parolado de s-ro ..., se la interpretisto lin bone komprenis."

La fakto, ke ofte okazas teknikaj difektoj en la aparatoj, tiel ke la laboro devas halti ĝis oni trovas la difekton kaj riparas ĝin, kaŭzas aliajn malfacilaĵojn. La groteska bildo de dignaj delegitoj kun la ĝenaj kaj dolorigaj aŭskultiloj sur la kapoj fariĝas preskaŭ tragika, kiam oni vidas iliajn kolerajn vizaĝojn, ĉar en la aŭskultilo premanta la orelojn ne aŭdiĝas la dezirata lingvo, sed iaj bruoj aŭ nenio.


Plia komplikaĵo estas trovi kompetentajn interpretistojn, precipe se temas pri fakaj, specialigitaj demandoj. Ju pli teknika estas la enhavo de parolado aŭ skribita teksto, des pli la interpretisto aŭ tradukisto devas scii la du lingvojn por povi redoni en la traduko la penson de la aŭtoro precize kaj kompreneble. Ofte necesas apartaj studoj de la fako, se oni volas kontentige plenumi la taskon.

La dokumentoj, kiuj devas esti eldonitaj en ĉiuj oficialaj lingvoj, kaŭzas pliajn malfacilaĵojn, eĉ pure teknikan konfuzon en la distribuo. Por eviti almenaŭ la lastan oni komencis uzi malsamajn paperkolorojn por la unuopaj lingvoj, ekz. por la angla la ruĝan, por la franca la bluan, por la hispana la flavan, por la rusa la sablokoloran, por la germana la grizan, por la itala la verdan, por la nederlanda la oranĝan. Se oni aplikas tiun ĉi metodon, la dokumentoj en difinita lingvo estas eldonitaj en la respektiva koloro kaj tiel ili fariĝas pli facile rekoneblaj. La samajn kolorojn povas porti kiel signojn la delegitoj kaj la interpretistoj, tiel ke oni tuj sciu kiun lingvon ili parolas.

1.3.2 Socia Aspekto

La nombro de ĉiaspecaj internaciaj kontaktoj, oficialaj kaj ne-

3. Laŭ la revuo *Associations Internationales*, n-ro 8/1967, p. 539, el 310 ekzamenitaj kongresoj, konsekutiva interpretado estis uzata en 22,7% kongresoj, simultana interpretado en 71,4%, dum 5,9% de tiuj kongresoj aplikis ambaŭ sistemojn.



Aŭskultiloj por samtempa interpretado ĉe UN en Ĝenevo.



Permašina tradukado: multekosta ideo, hodiaŭ plejparte forjetita.



La rivaleco de la grandaj naciaj lingvoj ne permesas, ke unu sola el ili iam fariĝu mondlingvo. La 56a Universala Kongreso de Esperanto (Londono, 1971) aŭdis raportojn i.a. pri la pozicioj de la germana, franca kaj angla lingvoj. Supre, maldekstre: raportas M.Macmillan por *British Council.*

oficialaj, inter registaroj kaj inter privataj organizaĵoj kaj individuoj, konsiderinde altiĝis. En la nuna epoko la internacia rilatado ne plu estas monopolo de pugno da privilegiitoj, sed rajto de la amasoj. Antaŭ la jaro 1860 ekzistis entute unu interŝtata organizaĵo kaj sep neregistaraj aŭ privataj. Laŭ la Jarlibro de Internaciaj Organizaĵoj, 12-a eldono por la jaro 1968-1969 kaj 13-a eldono por 1970-1971, kompilita kaj publikigita de la Unio de Internaciaj Asocioj (UIA), la nombro de ĉiuj interŝtataj organizaĵoj en 1956-57 estis 132, en 1966-67 ĝi jam estis 199 kaj nuntempe ĝi estas 530 kune kun la eŭropaj instancoj. La nombro de neregistaraj (privataj) internaciaj organizaĵoj kreskis de 985 en 1956-57 al 1.935 en 1966-67, kaj atingis 2.688 en 1970-71. Tiamaniere la nombro de ĉiuj organizaĵoj, nome interŝtataj kaj privataj, kreskis de 1.117 en 1956-57 al 3.218 en 1970-71. Paralele altiĝis la nombro de kongresoj kaj aliaj pli gravaj renkontiĝoj de la internaciaj organizaĵoj. Pli ol 500 el ili okazigas ĉiujare siajn kongresojn; preskaŭ 300 kongresas ĉiun duan jaron; aliaj renkontiĝas ĉiun trian, kvaran, kvinan aŭ sesan jarojn. Laŭ studo farita de UIA, la nombro de partoprenantoj varias inter malpli ol mil kaj pli ol dek mil. Surbaze de statistikoj por la periodo 1954 ĝis 1962, montriĝis, ke 89% de ĉiuj kongresoj havis malpli ol 1.000 partoprenantojn; 5,8% havis de 1.000 ĝis 2.000 partoprenantojn, 2,5% havis inter 2.000 kaj 4.000 partoprenantojn; 0,2% havis de 4.000 ĝis 10.000 partoprenantojn; 2,5% de la kongresoj havis pli ol 10.000 partoprenantojn [4].

Se oni komprenas la internaciajn rilatojn en la plej vasta senco de la vorto, oni devas aldoni al la centmiloj, kiuj ĉiujare partoprenas diversajn kongresojn kaj konferencojn, la milionojn da personoj, kiuj profesie aŭ kiel turistoj vojaĝas al aliaj landoj aŭ havas internaciajn kontaktojn. Neniam ĝis nun la amasoj havis la eblecon en tia grado partopreni en internaciaj rilatoj, kaj neniam ĝis nun ekzistis tiom da lingvaj obstakloj, kiuj baras la vojon al rekta, persona interŝanĝo de pensoj.

Sur la kampo de interŝtataj kaj diversaj neoficialaj internaciaj rilatoj la limigita nombro de oficialaj lingvoj kaŭzas ankaŭ alian malfacilaĵon. Nur la landoj, kies lingvoj estas oficialaj, povas reprezentiĝi per la plej talentaj kaj plej kompetentaj personoj. La aliaj landoj devas por tiu celo elekti ne la plej bonajn, sed tiujn, kiuj scias, almenaŭ modeste, la koncernajn oficialajn lingvojn. Tio necese malaltigas la intelektan nivelon de internaciaj renkontiĝoj.

4. Laŭ la informoj publikigitaj en la periodaĵo cit. sub 3. La Universalaj Kongresoj de Esperanto apartenas al la grupo de 2,5% (2.000-4.000) laŭ la meza nombro de partoprenintoj en la lastaj 10 jaroj. Ili do troviĝas inter la plej grandaj nuntempaj kongresoj.

1.3.3 Psikologia Aspekto

Ne ekzistas persono, kiu ne sentus sin ĝenata paroli aŭ skribi en fremda lingvo. Ju pli klera li estas, des pli lingve konscia li fariĝas. Nur primitivuloj esprimas sin libere, ĉar ili tute ne konscias pri la eraroj, kiujn ili faras parolante en fremda lingvo. Kleruloj bone konscias, ke esprimante sin en alia lingvo ili daŭre riskas ne nur diri ion, kio ne respondas plene al ilia penso, sed eĉ fari fatalajn erarojn, kiuj facile povas ridindigi la ideon. Ĝuste pro tiu konscio ili kutime havas komplekson de malplivaloro. Siavice, tio grandigas la embarason kaj kaŭzas pliajn, plene superfluajn erarojn, kiuj forestus, se la komplekso ne premus la menson. Multfoje okazas, ke tiu aŭ alia delegito volus ion diri, sed pro nesufiĉa scio de la lingvo prefere rezignas kaj silentas. En aliaj kazoj diversaj delegitoj, kies hejmaj lingvoj ne estas oficialaj, kun tremanta voĉo rapide tralegas sian antaŭe preparitan tekston kaj post tiu streĉo trankvile eksidas kaj ne plu intervenas. Sufiĉas observi la paroladojn dum kiu ajn internacia kongreso por konstati, ke kutime la paroladoj de la reprezentantoj, kies lingvoj estas oficialaj, estas multe pli longaj kaj konvinkaj ol tiuj de la delegitoj, kies lingvoj ne estas oficialaj. Ankaŭ en la debatoj kutime multe pli ofte kaj efike intervenas tiuj, kies hejmaj lingvoj estas oficialaj, ol aliaj. Tiu fakto ne nur ankoraŭ pli malaltigas la intelektan nivelon, sed ankaŭ pli facile venkigas la opiniojn de personoj, kiuj plene regas la oficialajn lingvojn.

1.3.4 Jura-Politika Aspekto

El jura vidpunkto la oficialigo de kvin lingvoj en UN neniel signifas, ke tiuj lingvoj akiris la pozicion de oficialaj en la monda diplomatio, ankoraŭ malpli sur aliaj kampoj: komerco, turismo, scienco, k.a. Ĝi nur signifas, ke en UN, aŭ en iu alia konkreta interŝtata organizaĵo, la lingvoj adoptitaj kiel oficialaj aŭ laboraj havas precize la pozicion, kiun fiksas la koncerna fonda akto, aŭ la respektivaj internaj regularoj. Krome, kiel jam montrite, la lingvaj reguloj tute ne estas samaj por diversaj organizaĵoj, kaj la nombro de privilegiitaj lingvoj neniel estas identa, nek temas pri la samaj lingvoj. La praktiko redakti duflankajn aŭ plurflankajn traktatojn en la lingvoj de la partioj vastiĝis kaj tiucele oni nun uzas ĉiujn eblajn lingvojn. Sekve, nenio pravigas la kredon, ke la lingva praktiko de Unuiĝintaj Nacioj estas ĝeneraligita. Ne ekzistas kia ajn regulo de internacia juro, kiu rekonus unusolan aŭ plurajn lingvojn kiel devige oficialajn por la diplomatio aŭ ĝenerale por la internaciaj rilatoj.

Aliflanke, la tuta lukto ĉirkaŭ la lingvoj malkovras la politikan gravecon de la afero. Nacio, kies lingvo estas oficiala, akiras konsi-

derindajn avantaĝojn kompare kun la nacioj, kies lingvoj ne estas oficialaj. La samo koncernas la rilaton inter la laboraj kaj oficialaj lingvoj. Ĉiuj grandaj nacioj insistas pri la uzo de siaj respektivaj lingvoj. Kaj kiel montras la tuta evoluo ekde la jaro 1753 ĝis hodiaŭ, ĉiam pli granda nombro da lingvoj akiras oficialan rangon. Tiu ĉi procezo ne povas esti haltigita. La politike kompromisa formulo de San-Francisko evidente fiaskis. La enkonduko de laboraj lingvoj ne nur ne solvis la problemon, sed eĉ aldonis pliajn komplikaĵojn. La lingva batalo etendiĝis de sur la kampo de oficialaj lingvoj, kie ĝi plue restas akra, al tiu de la laboraj. La lastaj jam tiel multiĝis, ke la distingo inter ili kaj la oficialaj komencis malaperadi kaj tre verŝajne baldaŭ komplete malaperos.

La suverena egaleco de la ŝtatoj, rekonita en la Ĉarto de UN, kaj la kulturaj rajtoj de la nacioj kaj individuoj, konfirmitaj en la Universala Deklaracio kaj en la paktoj pri la homaj rajtoj, impete postulas ankaŭ egalecon de lingvoj. Ĝi povas esti atingita aŭ tiel, ke efektive ĉiuj lingvoj ĝuu la saman rajton de oficialaj, aŭ ke oni akceptu por ĉiuj internaciaj rilatoj unusolan neŭtralan lingvon, kiel sugestis la Brita Registaro jam meze de la 18-a jarcento [5]. En la kazo de la Internacia Kortumo en Hago la uzo de nur du oficialaj lingvoj kontraŭas al la principo de plena egaleco de la partioj, kiu troviĝas en la fundamentoj mem de internacia justico. Evidente, reprezentanto, konsilisto aŭ advokato, kiu pledas antaŭ la kortumo en sia propra nacia lingvo, troviĝas en multe pli bona pozicio ol lia kolego, kiu tiucele devas uzi fremdan lingvon, eĉ se tiun lingvon li lernis dum multaj jaroj.

1.3.5 Ekonomia Aspekto

Kion kostas al la homaro la multlingveco, neniu fakte scias. La buĝetoj de internaciaj organizaĵoj ne estas tiurilate tute klaraj; kaj eĉ se ili estus, la informoj prezentus nur etan frakcion de ĉiuj kostoj. Aldone al elspezoj menciitaj en la prezento de la lingvaj bataloj en la sino de UN [6], jen kelkaj pliaj informoj:

Laŭ unu dokumento de Unesko el la jaro 1956, la nombro de paĝoj tradukitaj en 1954 kaj 1955 estis 79.582. Laŭ alia informo, same en la posedo de CED, la meza nombro de paĝoj tradukitaj ĉiujare en Unuiĝintaj Nacioj antaŭ 1956 estis pli ol 270.000. Laŭ la sama informo, la Lingva Sekcio de UN havis 40 tradukistojn por la angla, 82 por la franca, 68 por la hispana, 49 por la rusa, 68 por la ĉina kaj 10 por la araba, kiu, kvankam nek oficiala nek labora, estis ofte uzata. La

5. Vidu supre p. 5.
6. Vidu supre p. 10-12.

nombro de interpretistoj estis 69 kaj kelkaj el ili laboris en pluraj lingvoj, kion nun oni klopodas eviti.

Necesas atentigi, ke la nombro de tradukistoj aŭ interpretistoj kreskas en progresio laŭ la formulo $x = n\ (n - 1)$, en kiu „n" estas la nombro de uzataj lingvoj. Tio signifas, ke por 2 lingvoj estas necesaj 2 interpretistoj, tiel ke ili povu interŝanĝiĝi kaj ĉiu el ili traduki en la lingvon, kiun li bone mastras; por 3 lingvoj estas bezonataj 6 interpretistoj; por kvar lingvoj 12, por 5 lingvoj 20 interpretistoj ktp. Kompreneble, tio kaŭzas, ke ankaŭ la kostoj kreskas en la sama progresio.

Ĉe Unesko, laŭ la sama dokumento el 1956, la kostoj de interna tradukado en 1954 kaj 1955 estis entute por la angla lingvo 196.196 dolaroj, por la franca 344.101 dolaroj, por la hispana 192.443 dolaroj, por la rusa 41.266 kaj por la araba 51.948 dolaroj, entute 825.954 dolaroj. En tiu tempo la kostoj por la rusa estis malaltaj, ĉar nur limigita nombro da paĝoj estis tradukita en tiun lingvon. Cetere, la dokumento prave atentigas, ke en la kostojn de multlingveco oni devus enkalkuli ankaŭ aliajn elspezojn, kiuj ne rilatas rekte al la tradukado aŭ interpretado. Ekzemple, la kostoj de la Sekcio de Distribuo estus proksimume 25% pli malaltaj, se la sama nombro da ekzempleroj de dokumentoj kaj periodaĵoj estus distribuita en unu sola lingvo. En la buĝeto por la jaroj 1963-64 la kostoj de la Servo de Dokumentoj kaj Publikaĵoj devis estis altigitaj je 15%, nome de 3,107.422 dolaroj en 1961-62 al 3,568.209 dolaroj en 1963-64. Kun rezervo oni povas diri, ke tiuj elspezoj ĝenerale respondis al la kostoj de tradukado, interpretado kaj kunligitaj laboroj. La uzo de la araba lingvo, kiu tiam estis oficiala, sed ankoraŭ ne labora, kostis al Unesko 25.000 dolarojn jare. Nun la uzo de la araba kostas ĉ. 250.000 dolarojn jare. La buĝeto por 1973-74 antaŭvidas koston de pliaj 105.000 dolaroj jare.

En 1957 la Servo de Lingvoj kaj Kunvenoj de Unuiĝintaj Nacioj pagis 4,250.300 dolarojn nur por personaj elspezoj. La materiaj kostoj por la publikigo de dokumentoj devas esti aldonitaj al tiuj elspezoj. Tiuj ciferoj ne inkluzivis la Eŭropan Oficejon de UN en Ĝenevo, en kiu 9 interpretistoj, 54 tradukistoj kaj 107 sekretarioj kaj tajpistinoj laboris en la lingvaj servoj.

Intertempe, pro la nombra kresko de la uzataj lingvoj, perfektigo de la servoj kaj ĝenerala altiĝo de la kostoj, ankaŭ la elspezoj postulataj de la multlingveco konsiderinde altiĝis. Jen kelkaj pliaj ekzemploj:

La Konferenco de UN por Komerco kaj Evoluo, okazinta en 1968 en Nov-Delhio, kostis, laŭ la buĝeto de UN, pli ol 2 milionojn da dolaroj. La duono de tiu sumo estis elspezita pro la paralela

uzo de 4 lingvoj. Al la hinda ĉefurbo devis flugi 55 interpretistoj, 44 reviziistoj kaj 132 tradukistoj. La kostoj estis 878.500 dolaroj por la salajroj, vojaĝelspezoj kaj vivkosta monkompenso. La aperigo de la konferencaj dokumentoj ankaŭ en la franca, hispana kaj rusa kostis 292.500 dolarojn, sed tiu sumo ne inkluzivis la kostojn ligitajn al tajpado de dokumentoj kaj al dungo de 190 ekstraj interpretistoj, reviziistoj kaj tradukistoj, speciale varbitaj por la Konferenco.

La Internacia Konferenco pri Homaj Rajtoj, okazinta en Teherano en aprilo-majo 1968, postulis la servojn de 22 interpretistoj, 59 tradukistoj, 17 reviziistoj, 96 tajpistinoj, 6 ĉinlingvaj skribistoj kaj 5 lingvosekretariinoj je la suma kosto de 430.000 dolaroj.

Se oni adicias la ciferojn rilate plurlingvecon en kelkaj el la konferencoj, kiujn organizis UN en 1968 — pri homaj rajtoj, de ministroj pri socia protekto, de plenrajtigitoj pri la juro de traktatoj, pri la esplorado kaj paca utiligo de la kosma spaco, por revizio de la konvencio pri ŝosea trafiko — oni atingas la sumon de 1,023.075 dolaroj, kio ne inkluzivas la duonon de pli ol du milionoj da dolaroj por la menciita konferenco en Nov-Delhio.

Tiuj ciferoj koncernas sole kelkajn el la konferencaj elspezoj, kaj tial prezentas nur malgrandan parton de la tuta lingva buĝeto. UN konstante utiligas la servojn de kreskanta nombro da lingvaj oficistoj. En la interpreta kaj traduka servoj en la Sekretariato en Nov-Jorko ilia nombro estis 436 en 1968, dum 221 laboris en la lingva fako en Ĝenevo. Necesas aldoni la tradukistojn-interpretistojn en la regionaj ekonomiaj komisionoj (Bankoko, Adisabebo, Santiago...), kiuj ne aperas aparte en la buĝeto. Nur por pagi tiun personaron UN elspezis 6,700.000 dolarojn en 1968. Tiu sumo ne rilatas al la lingvaj servoj de la Organizaĵo por Industria Evoluo establita en Vieno, kiu postulis pliajn 922.164 dolarojn.

Se oni adicias ĉiujn kostojn, oni atingas la sumon de $ 9,700.000 kiujn UN elspezis en 1968 pro siaj lingvaj reguloj.

La saman situacion frontas ankaŭ aliaj internaciaj organizaĵoj. Laŭ la buĝeto de la Organizaĵo por Nutraĵo kaj Agrikulturo (FAO), ĝia traduka fako kostis 1,434.900 dolarojn en 1968 kaj 1969. La Monda Organizaĵo pri Sano devis elspezi en 1968 pli ol 1 milionon da dolaroj por la tradukado, interpretado kaj aliaj laboroj, kiujn kaŭzas la neceso eldoni ĉiujn dokumentojn plurlingve. Pristudo de la buĝeto de Unesko por 1971-72 permesas konstati, ke ĝiaj lingvaj kaj dokumentaj servoj kostas ĉ. 3,100.000 dolarojn jare por la 5 lingvoj.

Por doni ideon pri la grandega financa ŝarĝo, kaŭzita de plurlingveco, sufiĉos nur unu plia ekzemplo. Ĝis majo 1967 la Monda

Organizaĵo pri Sano havis nur 2 laborajn lingvojn: la anglan kaj la francan. En majo de tiu jaro la Asembleo de la Organizaĵo aldonis la hispanan kaj rusan kiel laborajn lingvojn de la Asembleo kaj de la Plenuma Komitato. La kosto por la uzo de la du menciitaj lingvoj estis taksita je 604.700 dolaroj, kondiĉe ke la prezoj estu samaj kiel en 1967, kio, kompreneble, ne okazis. Tiu sumo superis la kontribuon, kiun 19 ŝtatoj tiam pagadis kiel kotizon al la Monda Organizaĵo pri Sano: ili kune kontribuis 598.210 dolarojn jare. Alivorte, 19 malriĉaj landoj elspezis kaj plu elspezas el siaj malabundaj financaj rimedoj konsiderindajn sumojn, sen kia ajn konkreta profito por kiu ajn, nur por ke du pliaj lingvoj estu laboraj. Alia ilustro de la sama kazo: la uzo de la hispana kaj de la rusa kiel laboraj lingvoj elspezigas la tuton de la kotizoj de Nederlando kaj de Islando al la Organizaĵo.

Ŝokaj, vere timigaj, informoj troviĝas en la raporto, kiun en 1971 publikigis aparta komisiono post la ekzameno de la financoj de UN. Jen nur unu informo el tiu dokumento: en 1970 UN publikigis 867.800 dokumentojn, entute 773,086.990 paĝojn, kio ronde kostis 30 milionojn da dolaroj por la 4 laboraj lingvoj. La Projekto de Programo kaj Buĝeto de Unesko por 1973-74 antaŭvidas tradukon kaj revizion de 118.800 normaj paĝoj en 5 lingvoj, verkadon de 199.000 normaj paĝoj en 5 lingvoj, kaj internan presigon de 175 milionoj da paĝoj. La precizaj kostoj ne estas indikitaj, sed verŝajne ili estas tre proksimaj al tiuj de UN.

Se oni konsideras la daŭran vastiĝon de la tradukaj kaj interpretaj servoj, kiel ankaŭ la konstantan altiĝon de la prezoj, oni povas proksimume taksi, ke nur en UN la kostoj de multlingveco tre kredeble superas la sumon de 20 milionoj da dolaroj jare. Se oni enkalkulas ĉiujn elspezojn, kaŭzitajn de la nuna lingva situacio en ĉiuj organizaĵoj apartenantaj al la familio de UN, la kostoj estas multoble pli grandaj. Apenaŭ oni povas imagi la sumon, kiun oni atingus, se estus enkalkulitaj ĉiuj aliaj interŝtataj organizaĵoj. Al tiuj grandegaj sumoj necesas aldoni la elspezojn por tradukado, kiujn devas fronti la unuopaj delegacioj partoprenantaj en diversaj internaciaj konferencoj. Tiuj kostoj ne estas konataj. Oni nur scias, ke ĉiu delegacio, kies lingvo ne estas labora aŭ almenaŭ oficiala, havas siajn proprajn tradukistojn, kies tasko estas tradukadi dokumentojn kaj ofte ankaŭ paroladojn el la koncernaj naciaj lingvoj en la oficialajn aŭ laborajn, kaj prizorgi la tradukon en la respektivajn lingvojn el la oficialaj aŭ laboraj.

La situacio ne estas malpli malbona en aliaj sferoj. En 1958 okazis en Londono Konferenco pri Teknika Tradukado kaj ankaŭ ĝi pritraktis, interalie, la demandon de la kostoj. En la raporto de F.

Liebesny pri la ekonomia flanko de tradukado estas detale pritraktitaj la kostoj de teknikaj tradukoj. En la konkluda parto li emfazis, ke pluraj miloj da milionoj da vortoj estas tradukataj ĉiujare en la mondo. Lia propra kompanio tradukis en unu jaro proksimume 200.000 vortojn. Se oni multobligas tiun nombron per 50 por la aliaj grandaj komercaj organizaĵoj, oni atingas proksimume 10 milionojn da vortoj sole por la komerco kaj nur en Britio. La kostoj de tiaspeca tradukado treege varias, sed oni povas kalkuli, ke ili estas inter 4 kaj 10 anglaj pundoj por mil vortoj.

Tiuj ĉi kelkaj ciferoj donas nur la plej palan bildon pri la ekonomia ŝarĝo de multlingveco. Se oni prenas en konsideron la nombron de internaciaj organizaĵoj, ĉiujn internaciajn kongresojn kaj konferencojn, la kontaktojn en la industrio, komerco kaj turismo, la necesan longigon de internaciaj renkontiĝoj precipe en kazoj de konsekutiva traduko, la kostojn de lernado kaj ĉiujn aliajn elspezojn ligitajn rekte aŭ nerekte kun la multlingveco, oni ne troigas, se oni taksas la kostojn je centoj da milionoj da dolaroj ĉiujare. Kaj oni ne forgesu, ke tiujn grandegajn sumojn, en la lasta linio, devas pagi la ordinaraj civitanoj.

1.4 SOLVO

Malgraŭ tiu armeo da tradukistoj kaj interpretistoj, malgraŭ la plibonigoj en la teknika aparataro kaj malgraŭ la grandegaj sumoj elspezataj ĉiujare por tradukado kaj interpretado, la problemo mem neniel estas solvita. Ĉiuj ĉi rimedoj estas sole paliativoj, nur etfrakcie efikaj kaj provizoraj. Restas la fakto, ke eĉ ŝtatestroj en gvidaj pozicioj ne povas senpere kontakti. Forestas personaj rilatoj en internaciaj kongresoj kaj konferencoj. Elstaraj intelektoj kaj grandaj sciencistoj venas en embarase ridindajn situaciojn en fremdaj lingvaj medioj. Miskomprenoj abundas sur ĉiuj niveloj. La milionaj amasoj, kiuj vizitas aliajn landojn, restas plejparte mutaj kaj surdaj pro la lingvaj obstakloj. En plej bona kazo, kiel prave atentigis konata franca filozofo, la konversacio kutime finiĝas precize tie, kie ĝi devus komenciĝi.

Ĉu ekzistas solvo por tiu bedaŭrinda situacio?

Akcepto de unusola nacia lingvo, aŭ eĉ de du, kiel kelkaj proponis, montriĝis tute nerealeca. La historio de la lastaj jarcentoj montras pli ol klare, ke la grandaj nacioj ne estas pretaj cedi la akiritajn poziciojn de siaj lingvoj, kaj, eĉ pli, ke aliaj nacioj ĉiam pli postulas la saman pozicion por siaj respektivaj lingvoj. La malgrandaj nacioj kaj etnaj minoritatoj, ofte viktimoj de kultura genocido, siavice ĉiam pli laŭte aŭdigas siajn voĉojn por

La germana filozofo Gottfried Wilhelm Leibniz (dekstre) estis unu el multaj, kiuj antaŭvidis la aperon de internacia lingvo. La ideo aperas en lia *Disertacio pri la arto de kombino* (1666).



Pli frue, la ĉeha scienculo Jan Amos Komenský (sube) skribis en latinlingva verko *Via lucis* (1668): ". . . unu komuna lingvo estas por la mondo bezonata, kaj, se alia ne ekzistus, pli konvenus por tiu ĉi bezono destini la latinan, ol iun ajn alian. Sed . . . ni ne povas ne konsili pli volonte lingvon tute novan." Dekstre sube: la titolpaĝo de *Via lucis*, eldonita en Amsterdam.



VIA LUCIS,
Veſtigata & veſtiganda,
h. e.
Rationabilis disqviſitio, qvibus
modis intellectualis Animorum LUX,
SAPIENTIA, per omnes Omnium Hominum mentes,
& gentes, jam tandem ſub Mundi veſperam
feliciter ſpargi poſſit.

Libellus ante annos viginti ſex in Anglia ſcriptus,
nunc demum typis exſcriptus & in Angliam remiſſus,
Anno ſalutis
M. DC. LXVIII.

AMSTERODAMI,
Apud CHRISTOPHORUM CUNRADUM, Typographum.
Anno 1668.

protekti siajn naciajn identecojn.

Same tiel neimagebla estas la intensigo de la studo de fremdaj naciaj lingvoj en la lernejoj. La ĝisnunaj spertoj pruvas, ke eĉ la plej modernaj instrumetodoj donas nur tre modestajn rezultojn. Milionoj da gejunuloj tra la tuta mondo lernas diversajn fremdajn naciajn lingvojn kaj la rezulto kutime estas, ke, post multjara lernado, ili apenaŭ kapablas esprimi la plej elementajn ideojn, se ilia akirita scio ne estas limigita al la ebleco diri en la „lernita" lingvo, ke ili ne parolas ĝin. Kaj, cetere, kiujn lingvojn oni devus lerni en la hodiaŭa mondo? Iam oni povis centriĝi al la lernado de la latina aŭ nur de la franca, sed hodiaŭ oni devus lerni tutan aron da aliaj lingvoj. La superŝarĝitaj lernejaj programoj, kiuj prave dediĉas ĉiam pli grandan atenton al la diversaj branĉoj de naturaj kaj sociaj sciencoj, tutsimple ne povas toleri plian ŝarĝon per intensigo de instruado de fremdaj lingvoj, eĉ se tiu instruado povus doni kontentigajn rezultojn.

La esperoj, kiujn oni flegis rilate la elektronajn tradukmaŝinojn, montriĝis sufiĉe fantaziaj. Nun tiu ideo estas pli-malpli komplete forĵetita. Evidentiĝis, ke la maŝinoj ne sukcesas fari tion, kion eĉ plej lertaj tradukistoj kaj interpretistoj ne povas fari. La elektronaj maŝinoj povas havi nur tiom da „inteligento", kiom la homa intelekto metis en ilin. Krome, la kostoj de la tradukmaŝinoj estas tiel grandegaj, ke ili superas la kostojn de centoj da interpretistoj kaj tradukistoj, kiuj sendube faras la tradukan laboron senkompare pli bone ol la maŝinoj. Fine, eĉ se ne estus tiel, la apliko de tradukmaŝinoj signifus plian monopoligon de la internaciaj rilatoj, ĉar nur la plej riĉaj sociaj tavoloj kaj la ĉefaj gvidantoj de la ŝtatoj povus utiligi ilin.

Restas, do, kiel la sola racia solvo la enkonduko de neŭtrala internacia lingvo en ĉiujn internaciajn rilatojn, pri kio revis Descartes, Leibniz, Komenský kaj aliaj pensuloj.

El milo da projektoj, nur la Internacia Lingvo (Esperanto) iniciatita de D-ro Zamenhof transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta internacia kolektivo. En pli ol 80 jaroj de sia funkciado en la praktiko ĝi tiel kaj tiom evoluis, kiel evidentigos la sekvantaj ĉapitroj, ke ĝi plene taŭgas por ĉiuj internaciaj rilatoj kaj efike solvas la lingvan problemon en ĉiuj ĝiaj aspektoj. La baldaŭa estonteco montros ĉu la racio — kondiĉita de la tuta evoluprocezo sur la lingva kampo, precipe en la du postmilitaj jardekoj — venkos super egoismaj grandpotencaj postuloj, super antaŭjuĝoj kaj superstiĉoj, kaj ĉu la homaro tiamaniere fine solvos la lingvan problemon en internaciaj rilatoj, kiu de jaro al jaro sentiĝas ĉiam pli preme.

1.5 ESENCA BIBLIOGRAFIO

Basdevant, J. (k.a.), *Dictionnaire de la terminologie de droit international.* Paris 1960.

Frangulis, M. A., *Dictionnaire diplomatique.* Vol I. Paris 1936.

Lapenna, I., *La lingva problemo en la internaciaj rilatoj* (CED-Dok. A/II/1 kaj A/II/5), kaj la verkoj cititaj en ĝi. — „La situation juridique des 'langues officielles' avant la fondation des Nations Unies" kaj „La position des langues sous le régime des Nations Unies". *La Monda Lingvo-Problemo,* vol. 1, 1969, p. 5-18, 87-106, kaj la verkoj aŭ artikoloj cititaj en la du artikoloj.

Meillet, A., kaj M. Cohen, *Les langues du monde.* Paris 1952.

Ostrower, A., *Language, law and diplomacy.* London-Bombay-Karachi 1965.

Satow, E., *A guide to diplomatic practice.* 3-a eld. reviziita de H. Richtie. London-New York-Toronto 1932.

Periodaĵoj kaj Dokumentoj:

Annuaire des Organisations Internationales — Yearbook of International Organisations. Bruxelles, precipe 9-a eld. 1962-63, 12-a eld. 1968-69, 13-a eld. 1971-72.

ASLIB Proceedings, vol. 10, 1958, n-ro 5.

Associations Internationales — International Associations, monata revuo, Bruxelles 1957-1971, precipe la numeroj de septembro kaj oktobro, 1958; oktobro, 1959; aŭgusto kaj decembro, 1960; februaro 1961; majo, 1963; aŭgusto, 1967; marto, 1969.

Dokumentoj de UN: A/6860, A/PV/ 1642, A/Res. 2359 kaj A/C./SR. 1203-1227; A/6343, precipe p. 47 pri la kostoj; A/C.6/L.600 (takso de la kostoj por la Konferenco pri la Juro de Traktatoj); A/6670, precipe Aldono III pri la kostoj de la Konferenco pri la Homaj Rajtoj; A/Conf.35/PC/L.4/Add.1; A/6705, Buĝeto de UN por 1968, precipe p-oj 177-8 rilate la kostojn de la Konferenco en Nov-Delhio; A/6875; A/6905, precipe p-oj 36-38 kaj 74-75; A/INF/124, precipe p-oj 8-14 pri la kostoj por produktado de dokumentoj; A/7386/Corr. 1 (pri la kostoj de lingvoinstruado kaj la demando de la rusa kiel laborlingvo); A/C.5/L.962 (decido, ke la rusa fariĝu labora lingvo) — *Dokumentoj de la Monda Organizaĵo pri Sano (WHO/OMS):* Res. WHA20.21 kaj A20/AFL/SR/4; C 67/3 (programo kaj buĝeto por 1968-69); EB39.R41; A20/AFL/10 (pri la oficialigo de la rusa kaj hispana kiel laboraj lingvoj); Oficialaj Aktoj de WHO/OMS, no. 154 (projekto de programo por 1968) — *Dokumentoj de Unesko:* precipe la programoj kaj buĝetoj por 1971-72 kaj 1973-74.

Esperanto, Monata Organo de UEA, vol. 62-64, 1969-71, precipe la rubrikoj de CED.

ĈAPITRO 2

LA INTERNACIA LINGVO (ESPERANTO)

2.1 FAKTOROJ INFLUANTAJ LA LINGVO-EVOLUON

2.1.1 Lingvo kiel Socia Fenomeno

Lingvo estas socia fenomeno, kaj ne ia „natura" aŭ „biologia" aperaĵo. Tio signifas, ke ĝi povis ekesti, ke ĝi evoluis kaj evoluas ekskluzive en la kadro de la homa socio. La lingvo, do, estas regata de sociologiaj kaj ne de biologiaj leĝoj. Tio ankaŭ signifas, ke la portanto de la lingvo ĉiam estis kaj estas iu homgrupo. Sed ĝi tute ne signifas, ke tiu portanto estas aŭ devas esti nur la „nacio". Ekzistas eĉ hodiaŭ personoj, kiuj, sen troa pripensado kaj sen kia ajn scienca respondecosento, emfazas pri la „nacia animo" aŭ pri la „nacia spirito" kiel pri la solaj kreofortoj de la lingvo. El tio oni ofte konkludas, ke internacia lingvo estas principe neebla, ĉar, ja, ne ekzistas ia „internacia nacio" kun „internacia animo"!

Estante socia fenomeno, la lingvo havas siajn radikojn en la socio, sed samtempe, foje ekestinte, ĝi mem influas sian propran bazon. Tiamaniere la lingvo, same kiel ĉiu alia socia fenomeno, ĉiu el ili dependa de sia karaktero, troviĝas en reciproka funkcia rilato kun la socio.

Tiu ĉi fakto havas unuarangan signifon por la ĝusta kompreno ne nur de la esenco mem de la lingvo, sed ankaŭ por la rolo, kiun ĝi ludas en la socio. La lingvo estas, unuflanke, subigata al influo de difinitaj faktoroj (kiuj, cetere, en pli aŭ malpli alta grado ludas sian rolon ankaŭ koncerne ĉiujn aliajn sociajn fenomenojn), sed, aliflanke, ĝi mem fariĝas unu el la faktoroj, eĉ tre grava,

kiuj aktive influas la evoluon de la socio.

Kiel ĉiuj lingvoj, ankaŭ la Internacia Lingvo estas socia fenomeno kaj ĝi estas regata principe de la samaj leĝoj.

En la lingvoevoluo estas klare rimarkeblaj du kontraŭaj tendencoj: la tendenco al disfalo kaj la tendenco al unueco. Ili estas nenio alia ol manifestiĝo de du antagonismaj kategorioj de faktoroj, kiuj seninterrompe — sed ne kun la sama efiko en ĉiu epoko kaj en ĉiu medio — influas la lingvon. Al la unua kategorio apartenas pluraj diferencigaj faktoroj, kiuj efikas rompe, disige, disfale. La dua kategorio konsistas el unuecigaj faktoroj, kiuj efikas kuntene, maldisige, do unuecige.

2.1.2 Diferencigaj Faktoroj

La ĉefaj diferencigaj faktoroj estas:

2.1.2.1 *Geografia Faktoro.* — Klimato, altaj montoj, grandaj maroj, larĝaj riveroj, netrapaseblaj marĉoj, densaj arbaregoj, senvivaj dezertoj sendube disigas la homgrupojn unu de la alia, precipe en la primitivaj stadioj de la evoluo. Sub la influo de tiuj kondiĉoj ĉiu grupo ne nur kreas al si sian apartan lingvon, sed la lingvoj ankaŭ restas sen reciprokaj kontaktoj. Tio, kompreneble, malebligas la proksimiĝon de la lingvoj.

La geografia faktoro ludis tre gravan rolon sur la plej malaltaj ŝtupoj de civilizo, sed eĉ hodiaŭ ĝi ne perdis ĉian signifon. La homgrupoj, kiuj vivas izolite unuj de la aliaj, sen ia ajn kontakto aŭ kun nur tre malmulte da reciprokaj rilatoj, havas apartajn lingvojn, kiuj ne estas komprenataj ekster la respektivaj medioj.

Estas sciate, ke la indiĝenoj de ambaŭ Amerikoj posedas grandegan nombron da lingvoj, tre malsamaj inter si. Viglan priskribon de la multnombraj lingvoj en Norda Ameriko donis jam en la 17-a jc. Gabriel Sagard en sia libro *Granda Vojaĝo en la Lando de Huronoj.* Li asertis, ke en la vizititaj regionoj tre malofte du vilaĝoj parolis la saman lingvon. Edward Sapir, kiu dediĉis grandan parton de sia vivo al la studo de la kulturo de la amerikaj Indianoj, parolas pri la senfina nombro da indiĝenaj lingvoj.

La indiĝenoj de Aŭstralio, kies nombro estas taksata je ĉ. 200.000, parolas minimume 500 lingvojn.

En Azio estas la sama situacio. La lingvoj de tiu granda kontinento estas tre malsamaj kaj ilia nombro grandega. La lingva esploranto — diras la konata usona lingvisto Mario Pei — trovas, kompreneble, en Azio lingvojn de unua rango el vidpunktoj nombra, komerca, politika kaj kultura. Sed li ankaŭ trovas tie „miria-

don da malpli grandaj lingvoj, kies parolantoj estas relative malmultnombraj kaj kiuj neniam atingis tre altan kulturan nivelon."

Centoj da amerikaj lingvoj — diras la fama franca lingvisto A. Meillet — ne proksimiĝis unuj al la aliaj, ĉar la plej granda parto de la kontinento ne estis dense loĝata kaj tial la unuopaj grupoj estis izolitaj. La samo validas por kiu ajn alia regiono kun similaj geografiaj kondiĉoj.

2.1.2.2 *Ekonomiaj-Sociaj Faktoroj.* — Oni povas distingi plurajn faktorojn apartenantajn al tiuj ĉi grupo. Jen la plej gravaj:

Unuavice estas menciinda la *kasta aŭ klasa faktoro.* Ĉiu ekonomia diferenciĝo signifas samtempe ankaŭ socian diferenciĝon, kaj tio nepre rezultigas lingvan diferenciĝon. Se la klasoj estas akre dividitaj unuj de la aliaj, ankaŭ iliaj lingvoj manifestas gravajn diferencojn. Male, se la klasoj havas pli viglajn reciprokajn kontaktojn, iliaj lingvoj montras malpli da diferencoj.

La kasta socio de antikva Hindio prezentas tipan ekzemplon de preskaŭ kompleta kasta izoliteco. Tial en Hindio la kastoj havis siajn apartajn lingvojn komencante per la supera kasto de bramanoj, kiuj parolis sanskrite, ĝis la malsupraj tavoloj, troviĝantaj ekster la kastoj, kiuj parolis diversajn prakritajn dialektojn.

La latina lingvo estis en la komenco fakte la lingvo de la patricioj en Romo. En la feŭda mezepoka Eŭropo la reganta klaso de la nobelaro, la eklezio kaj la scienco estis la socia portanto de la mezepoka latina, dum la servutulaj popolamasoj parolis plej diversajn lingvojn kaj dialektojn.

En la moderna epoko la klasa faktoro ne plu ludas tian rolon, ke ĝi povus kaŭzi la kreiĝon de tute apartaj lingvoj, sed estus eraro pensi, ke ĝia influo tute perdiĝis. La diversaj socitavoloj havas ofte la tendencon amasiĝi en apartaj kvartaloj, tiel ke ankaŭ el teritoria vidpunkto ili estas dividitaj. La rilatoj inter ili fariĝas en tiuj kazoj nur eksteraj, formalaj kaj maloftaj. La sekvo estas, ke ankaŭ la lingvaj esprimoj de tiuj grupoj sufiĉe diferencas. „Ekzistas klasoj kaj subklasoj, ĉiu kun siaj lingvaj apartaĵoj", diras A. Meillet.

Alia grava faktoro estas la *profesia.* La divido de la laboro kaj, rezulte, la ekesto de profesioj kaŭzis la kreiĝon de apartaj, profesiaj aŭ teknikaj lingvoj. Kie ajn ekzistas divido de la laboro, devas ekzisti ankaŭ divido de la lingvo. Ĉiu profesio, ĉiu okupo, havas siajn proprajn terminojn, kiuj plej ofte ne estas konataj ekster ĝi. Ju pli la homaro evoluas, ju pli la diversaj fakoj specialiĝas, ju pli la unuopulo dediĉas sian fizikan kaj spiritan aktivadon al sia fako, des pli specialiĝas ankaŭ la koncernaj fakaj lingvoj.

2.1 FAKTOROJ INFLUANTAJ LA LINGVO-EVOLUON

La tuta vortprovizo de la plej evoluintaj lingvoj atingas hodiaŭ plurajn centmilojn da esprimoj. El ili, relative nur tre malgranda nombro estas komuna al ĉiuj uzantoj de la koncerna lingvo. Eĉ en Anglio, do en lando kun tre alte evoluintaj kulturo kaj civilizo, la kamparano kelkloke ne konis pli ol 300 vortojn ankoraŭ meze de la pasinta jarcento, laŭ la enketo kiun faris tiam la elstara germana lingvisto Max Müller. Nur la plej kleraj personoj posedas ĉ. 10.000 vortojn. Shakespeare, unu el la plej vortriĉaj el ĉiuj aŭtoroj, uzis en ĉiuj siaj dramaj verkoj ĉ. 15.000 vortojn, dum Racine skribis sian tutan verkaron per 6.000 vortoj. Plej verŝajne, 4.000 ĝis 5.000 vortoj (en la lingvoj, kompreneble, en kiuj la vorto havas aŭtonoman lingvan valoron) reprezentas la mezan aktivan vortprovizon de mezklera individuo. Ĉio alia apartenas al profesiaj, fakaj, teknikaj lingvaj esprimoj. Tien ĉi oni devas ankaŭ alkalkuli la specialajn vortojn, ekestintajn surbaze de diversaj akcesoraj homaj aktivadoj, kiaj sporto, ĉasado, vojaĝado, ktp.

2.1.2.3 *Seksa Faktoro.* — Ĝi povas ludi diferencigan funkcion en difinitaj sociaj kondiĉoj. Oni konstatis, ke, ĉe diversaj primitivaj triboj, ankaŭ la parollingvoj de virinoj tre forte diferencas de la viraj. La kafraj virinoj posedas multajn apartajn vortojn, kiuj ne troviĝas en la lingvo de la viroj. Pro tabuo, al virinoj estas malpermesite uzi vorton, enhavantan kiun ajn sonon, kiu estas simila al la sonoj de la nomoj de iliaj plej proksimaj viraj parencoj. En aliaj indiĝenaj lingvoj de Afriko la tabu-vortoj simile influas la lingvan diferenciĝon. En Afriko oni trovis ankaŭ tribojn, kie la virinoj parolis tute malsaman lingvon. Tiun fenomenon kaŭzis la fakto, ke la venkinta tribo ekstermis ĉiujn virojn de la venkita kaj ekposedis ĝiajn virinojn.

En la feŭda mezepoko de Eŭropo la virinoj malofte sciis la latinan. Dante atribuis al la influo de la virinoj la unuajn provojn enkonduki en la literaturon de Italio la popollingvojn (*lingua volgare*). Fakte, la vera kaŭzo estas, en Italio same kiel aliloke, la komenciĝo de interna malintegriĝo de la feŭda sistemo kaj la fortikiĝo de la burĝa elemento. Rilate la lingvon, tiun procezon helpis ĉiuj tavoloj kun socie malpli alta pozicio, inkluzive la pastraron de malsupraj rangoj kaj la virinojn senkonsidere al la klasa aparteno.

Ekster tiaj kazoj oni trovas diferencojn inter la vira kaj virina lingvoformoj depende de la apartaj laborfunkcioj, kiujn efektivigas la du seksoj, precipe ĉe gentoj sur pli malalta ŝtupo de civilizo.

La seksa faktoro ne estas fakte biologia, kiel unuavide povus ŝajni, sed ĝi estas ekonomia kaj socia faktoro. La sekso kiel tia

ne influas grave la lingvon, precipe ne hodiaŭ, sed ĝi povas fariĝi tre influa, se ĉiu el la du seksoj ekskluzive okupiĝas nur pri difinitaj laboroj.

2.1.2.4 *Religia Faktoro.* — Preskaŭ ĉiuj religioj uzas apartajn lingvojn por siaj ritoj. En antikva Romo eĉ la pastroj mem apenaŭ povis kompreni siajn sanktajn himnojn. En la budhistaj temploj de Azio — diras M. Pei — la sanskritaj preĝoj kaj sanktaj vokoj estas murmurataj de pastroj, kiuj preskaŭ komplete forgesis ilian signifon. Ĉiu el la kristanaj religioj havas ĉie specialan lingvon, kiu tute aŭ grave diferencas de la komuna lingvo. La sankta lingvo de islamo estas la tradicia araba literatura lingvo, dum la suda budhismo aplikas la pali-lingvon. La religiaj ritoj — diras A. Meillet — destinitaj transporti la homon en mondon apartigitan kaj sanktecan, postulas lingvon same tiel apartan.

2.1.2.5 *Aliaj Faktoroj.* — Ankaŭ aliaj faktoroj influas diferencige Tiaj, ekz., estas la transdono de la lingvo al la novaj generacioj, la politikaj malhelpoj al interregiona aŭ internacia komunikado kaj pluraj aliaj. Sendube ankaŭ tiuj faktoroj ludas pli aŭ malpli gravan diferencigan rolon kaj ili ne estas neglekteblaj.

2.1.3 Unuecigaj Faktoroj

Multnombraj estas la elementoj, kiuj efektivigas tute inversan efikon sur la lingvoevoluon. La unuecigaj faktoroj estas divideblaj je tri ĉefaj grupoj: ekonomiaj-sociaj, teknikaj kaj klerigaj.

2.1.3.1 *Ekonomiaj-Sociaj Faktoroj* — La tuta historio de la homaro estas, esence, historio de transirado al pli altaj produktometodoj surbaze de novaj, ĉiam pli taŭgaj produktiloj. Tiu vojo, kiu daŭre celis al pli larĝaj formoj de kunvivado, kondukis la homaron de la primitiva hordo, tra la tribo, gento kaj popolo ĝis la hodiaŭaj nacioj, kaj nun ĝi direktiĝas al integriĝo de la homaro.

Sur tiu vojo al la supro, pluraj gravaj elementoj manifestadis ĉiam pli sian unuecigan influon. Jen la ĉefaj:

La transpaso al pli progresaj produktosistemoj kaŭzis la kreon de pli ampleksaj sociaj unuoj kun pli evoluinta *divido de la laboro* kaj, sekve, kun pli vastaj interŝanĝoj ne nur materiaj, sed ankaŭ spiritaj. Tiamaniere, la divido de la laboro, kiu, unuflanke, prezentiĝas kiel diferenciga faktoro en senco vertikala (formiĝo de profesiaj lingvoj), aliflanke interdependigas ekonomie la homojn sur larĝaj teritorioj kaj, sekve, montriĝas kiel potenca unueciga faktoro en senco horizontala ne nur nacie, sed ankaŭ internacie.

Ju pli dividita estas la laboro, ju pli specialiĝas la aktivado de unuopulo, des pli dependa li fariĝas de la aliula laboro. La interŝanĝoj multobliĝas spece kaj ampleksiĝas teritorie. Hodiaŭ ili transpasas la limojn de unuopaj nacioj kaj etendiĝas sur la tuta terglobo. Ĉiuj artaj provoj haltigi tiun normalan ekonomian kaj socian evoluprocezon per rimedoj aŭtarkiaj, fiaskis kaj devos fiaski komplete ankaŭ en la estonteco.

Ĝuste tiu interdependeco montriĝas kiel potenca unueciga faktoro ankaŭ sur la lingva kampo. Ĝi troviĝas en la fundamentoj mem, sur kiuj elkreskis kaj la grandaj unuecaj literaturaj naciaj lingvoj kaj, poste, la Internacia Lingvo.

La progresado de la materia vivo de la socio estas akompanata de progresado sur kampo spirita. Apartan signifon havas la ideo pri la *egaleco de la homoj*, kiu ricevas ĉiam pli larĝan kaj pli profundan enhavon: de la religia koncepto pri la egaleco en la morto kaj post la morto, al la politika egaleco, proklamita de la Franca Revolucio, ĝis la nuntempaj postuloj pri kiel eble plej granda ekonomia egaleco kaj socia sekureco. La akcepto de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj estas klara simptomo de tiu fakto. Inter la antikva-greka vidpunkto, rigardanta ĉiujn alilandanojn malsuperaj barbaroj, kaj la nuntempa principe proklamita, kvankam ankoraŭ grandparte ne realigita, egaleco de ĉiuj rasoj, nacioj kaj individuoj ja estas granda diferenco.

La egaliĝado de la kulturo kaj civilizo en la tuta mondo (kio, kompreneble, neniel signifas ilian unuformiĝon), la demokratiĝado de la publika vivo kaj de la politikaj institucioj — ĉio ĉi ebligas pli viglajn kontaktojn inter la homoj kaj speguliĝas en la proksimiĝo de la lingvoj.

2.1.3.2 *Teknikaj Faktoroj.* — La evoluo de plej diversaj trafikiloj kaj komunikiloj ebligis grandskalajn kaj ĉiaspecajn kontaktojn ne nur en naciaj kadroj, sed ankaŭ internacie. Ŝipoj, fervojoj, aviadiloj; aŭtobusoj kaj aŭtomobiloj; telegrafo, telefono, radio, televido estas teknikaj rimedoj de rilatado, sed samtempe — ĝuste tial — potencaj fortoj de lingva proksimiĝo. Per ili veturas kaj flugas de regiono al regiono, de lando al lando ne nur varoj, ne nur homoj, sed ankaŭ vortoj. Samtempe, pro la sama kaŭzo, ankaŭ la esprimmaniero egaliĝas. Tio sendube firmigas la kuntenon de la naciaj literaturaj lingvoj, sed ĝi samtempe plirapidigas la grandan unuecigan procezon de la lingvoj ĝenerale, procezon, kies esprimo estas la Internacia Lingvo.

2.1.3.3 *Klerigaj Faktoroj.* — La eltrovo de la skribo, la ekesto de la literaturo, la invento de la presmaŝino, la modernepoka ekfloro

de la scienco kaj beletristiko, la lernejoj kaj universitatoj, la legejoj kaj bibliotekoj, la teatro kaj sonfilmo, la radio kaj televido — jen nur kelkaj el la multnombraj klerigaj faktoroj. Multiĝante kaj disvastiĝante paralele kun la progresado sur la aliaj kampoj, ili estas treege potencaj subtenantoj de la unueciga evolulinio de la lingvo. Se hodiaŭ la civilizitaj nacioj havas siajn unuecajn komunajn lingvojn, tio estas grandparte rezulto de la klerigaj faktoroj, malantaŭ kiuj troviĝas la deviga potenco de la ŝtato, tuta armeo da klerigaj soldatoj, konsiderindaj financaj kaj ĝenerale materiaj rimedoj.

2.1.4 Evolutendenco

Ĉiuj ĉi unuecigaj kaj diferencigaj faktoroj, tuŝitaj nur tre ĝenerale, agas samtempe, interpleksiĝas, influas unu la alian, reciproke sin helpas aŭ kontraŭstaras, estas pli gravaj en unu socia grupo, malpli en alia, pli efikaj sur unu evoluŝtupo, malpli sur alia, estas mem influataj de la lingvo aŭ per ĝi, agas sur la homan menson kaj estas ŝanĝataj de tiu menso. Sed se oni ĵetas nur rapidan rigardon al la traktata fenomeno, oni tuj rimarkas, ke *kun la ĝenerala progresado de la homaro la unuecigaj faktoroj amasiĝas kaj fariĝas ĉiam pli gravaj, dum la diferencigaj ludas ĉiam pli modestan rolon.*

Por korekta kompreno kaj objektiva taksado de la pozicio de Esperanto en la kadroj de tiu ĉi ĝenerala lingvoevoluo, la konstatita fakto havas unuarangan signifon.

Kiel ĉiu alia lingvo, ankaŭ Esperanto ekestis sur difinita ŝtupo de evoluo. Kiel ĉiu alia lingvo, ankaŭ ĝi havas sian portanton en la homa socio. Kiel ĉiu alia lingvo, ankaŭ ĝi estas socia fenomeno, subigata al influo de diversaj faktoroj. La Internacia Lingvo ŝuldas sian formiĝon, vivon kaj progreson al la unuecigaj fortoj en la sino de la tuthomara socio.

Tute ne gravas ĉu la homgrupo, kiu estas la kreanto kaj uzanto de la lingvo, estas hordo, en aliaj historiaj kondiĉoj tribo, aŭ kasto, aŭ klaso, aŭ religia komunaĵo, aŭ nacio, aŭ, en apartaj kondiĉoj, grupo da homoj sentantaj efektive sian apartenon ne nur al siaj respektivaj regionoj kaj nacioj, sed ankaŭ al la homaro, kaj komprenantaj, ke tiu ĉi tuthomara sento rezultigos utilajn praktikajn sekvojn, unuflanke, kaj plifortiĝos, ĝi mem, aliflanke, nur per ĝenerala akcepto kaj praktika aplikado de neŭtrala internacia komunikilo. Gravas ĉiam la fakto, ke temas pri homa grupo. Ĝi ĉiam estis kaj restas la plej supera leĝdona instanco de la lingvo, kvankam ankaŭ individuo povas havi tre elstaran rolon, se lia lingvokrea aktivado estas konforma al la leĝoj regantaj la lingvoevoluon.

La homgrupo, tamen, ne povas krei sian lingvon tute arbitre, plene laŭplaĉe. La lingvo estas ĝis certa grado kondiĉita de la medio kaj de ĝia tuta antaŭa evoluo kaj koncerne sian enhavon kaj koncerne sian formon.

2.2 EKESTO DE LA INTERNACIA LINGVO

La Internacia Lingvo povis ekesti nur en tiaj historiaj kondiĉoj, kiam, unuflanke, la progreso de la internaciaj rilatoj atingis tian karakteron kaj tioman gradon, ke ili sentigis efektivan bezonon pri ĝi, kaj kiam, aliflanke, tiu sama progresado kreis sufiĉan internacian lingvomaterialon, sur kiu povis esti bazita vere internacia lingvo, t.e. lingvo reprezentanta laŭ la internaj elementoj sintezon de la priparolita evoluprocezo. Tion bonege kaj genie komprenis la aŭtoro de Esperanto, D-ro L. L. Zamenhof. Sian penson li formulis en malonga frazo: „Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia". Tiu vero estis presita sur la titolpaĝo de la unua lernolibro, aperinta en la jaro 1887.

La ideo pri komuna lingvo estas multe pli malnova ol la Internacia Lingvo mem. Legendoj el antikva epoko pruvas, ke jam tiam oni sentis la mankon de komuna lingvo por interpopola rilatado. Sed en tiu tempo nek la bezono por ĝi povis esti tre sentebla, nek la ĝis tiam atingita evoluo estis kreinta sufiĉe abundan internacian lingvomaterialon, el kiu povus esti formita internacia lingvo. Necesis, ke pasu multaj jarcentoj, por ke la kondiĉoj maturiĝu. Tio okazis en la nova epoko, kiam, interalie, la unuecigaj faktoroj venke ekmarŝis kontraŭ la diferencigajn.

La transpaso de feŭdismo al nova ekonomia sistemo, al kapitalismo — karakterizita de amasa, maŝina produktado por la merkato, de ĉiam pli detala labordivido, de granda internacia komerco — havis pluroblan efikon sur la lingvon:

La progresema burĝaro ĉie starigis la postulon pri kreo de unuecaj ŝtatoj. Detruante la feŭdan disrompitecon, ĝi iom post iom sukcesis. Paralele kun la formiĝo de la nacioj kaj de la naciaj ŝtatoj, formiĝis kaj plue evoluas la komunaj naciaj literaturaj lingvoj.

La mezepoka latina, kies socia portanto estis la feŭda reganta klaso, malaperis iom post iom kune kun sia portanto kaj ĝi restas nur en la uzo de la romkatolika eklezio kiel aparta religia lingvo.

Pro la malapero de la latina, pro la aliflanke kreskanta internacia rilatado, sentiĝis ĉiam pli kaj pli forta bezono por neŭtrala internacia lingvo. La manko de komuna internacia lingvo sentiĝis tiel forte, ke amasiĝis provoj krei ĝin.

Sendepende de tiuj provoj, tute spontane formiĝis kaj plue formiĝas ĉiam pli ampleksa, vere internacia lingvomaterialo. Ĝi konsistas ne nur el internacia radikaro, sed gravan ĝian parton formas ankaŭ la proksimiĝo de la esprimmaniero.

Tiele, surbaze de egaliĝado de la civilizo kaj de kulturaj interŝanĝoj, ekĝermis la fundamentoj de la Internacia Lingvo en la sino mem de la tuthomara socio. Tiusence ĝi estas kondiĉita, determinita ĝis certa grado, same kiel ĉiu ajn alia lingvo.

2.3 STRUKTURO KAJ VALORO


2.3.1 Deveno

La aŭtoro de Esperanto, D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, naskiĝis en Bjalistoko, kiu tiam apartenis al Ruslando, en la jaro 1859. Lia patro estis instruisto de fremdaj lingvoj.

En letera respondo al N. Borovko, kiu estis demandinta lin pri la deveno de Esperanto, Zamenhof diris, ke li ne rememoras precize kiam ĝuste li venis al ideo pri internacia lingvo. Liaj frutempaj rememoroj estis ligitaj al tiu ĉi ideo. La cirkonstancoj de lia infanaĝo tre akcelis ĝian formiĝon. Lia naskiĝurbo estis loĝata de kvar nacioj kun malsamaj lingvoj: la rusa, la pola, la germana kaj la hebrea. Tiuj popoloj vivis en konstanta reciproka malamo, kiu manifestiĝis ankaŭ en prilingvaj bataloj. Estante ankoraŭ knabo li opiniis, ke tiu ĉi situacio povus esti plibonigita per kreo de iu neŭtrala lingvo. En gimnazio li konvinkiĝis, ke la komplikeco de la gramatikoj de la lingvoj estas peza kaj nebezona. Tial li komencis prilabori simpligitan gramatikon.

Kompreneble, lingvo devas havi ankaŭ vortaron. La grandiozeco de la afero fortimigis lin ĝis li komprenis, ke pere de afiksoj oni povas formi el unu radiko multajn vortojn kaj ke tio tre faciligas la laboron de la memoro. Koncerne la radikojn — Zamenhof plue klarigis al Borovko — li en la unua tempo pensis, ke ili devus esti kiel eble plej mallongaj, do elpensitaj *apriore*. Baldaŭ li forĵetis tiun penson, ĉar li rimarkis, ke tiaj radikoj — vere tute artefaritaj — estus tre malfacile memoreblaj. Li konstatis la fenomenon, prezentitan supre, ke en la modernaj lingvoj ĉiam pli granda nombro da internaciaj radikoj estas ĝenerale uzata. Tiujn radikojn li prenis kiel bazon por sia vortaro.

Jam en la jaro 1878, kiam li estis en la lasta klaso de gimnazio, Zamenhof estis fininta la unuan projekton de la lingvo. Dum la universitataj studoj Zamenhof prilaboradis sian lingvoprojekton plenajn sep jarojn, ĝis la jaro 1885. Tio estis la plej malfacila periodo de lia vivo, laŭ lia propra konfeso en la letero al Borovko.



D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859 – 1917)

Timante esti mokata, li parolis al neniu pri siaj laboroj, sed en soleco li daŭre tradukadis, verkadis kaj pensadis en sia lingvo. Fine, en la jaro 1887 aperis la unua lernolibro sub la titolo *„Internacia Lingvo de Doktoro Esperanto"*. Sian projekton li tute prave nomis „Internacia Lingvo", ĉar ĝi fakte estis plene internacia laŭ siaj elementoj. Pro modesteco, kaj ankaŭ tial, ĉar li deziris ligi kiel eble plej malmulte la lingvon al sia personeco, li ne eldonis la lernolibron sub sia nomo, sed sub la pseŭdonimo „Doktoro Esperanto", t.e. „kiu esperas". Poste, la lingvo mem estis ofte nomata laŭ tiu pseŭdonimo.


La gramatiko de Esperanto estas tre simpla. La alfabeto konsistas el 28 literoj, el kiuj 5 estas vokaloj (kiel en la itala), kio donas al la lingvo klarecon kaj belsonecon. La gramatiko konsistas el 16 mallongaj bazaj reguloj, kiujn oni povas kompreni en duonhoro [1]. Se oni ĝin komparas kun kiu ajn alia gramatiko, oni facile konstatas la geniecon de la simpleco. Sufiĉas konsideri, ke en la franca lingvo ekzistas ĉ. 2.300 finaĵoj nur por la verboj. En Esperanto ili estas 12 kaj ili ebligas esprimi ĉiujn nuancojn.

La granda fleksebleco de Esperanto estas pruvita en pluraj eksperimentoj. Tiel, ekzemple, jam en la jaro 1913, sub la gvido de Tristan Bernard, oni ekzamenis la flekseblecon de Esperanto en speciala komisiono. Literatura teksto estis tradukita en plurajn lingvojn, inkluzive Esperanton, kaj poste la sama teksto estis tradukita de aliaj tradukantoj, ne konantaj la originalan tekston, en la lingvon de la originalo. Montriĝis ke la plej perfektaj tradukoj estis faritaj pere de Esperanto, ĉar la retradukita teksto el Esperanto estis la plej proksima al la originalo.

2.3.2 Internacieco

Zamenhof bone komprenis, ke lingvo internacia devas konsisti el elementoj maksimume internaciaj. Tial li metis en ĝian vortaron radikojn jam internaciiĝintajn kaj signis la vojon por plua riĉigo de la lingvo ankaŭ per novaj internaciaj esprimoj. Sed li perfekte komprenis, ke lingvo ne konsistas nur el vortoj; plue, ke, unuflanke, ne ekzistas absoluta internacieco de la vortoj — nek laŭenhave, nek laŭforme — kaj ke, aliflanke, por atingi facilecon estas necese sistemigi tiun internacian lingvomaterialon kaj liberigi ĝin de balastaj akcesoraĵoj, aŭ absurdaĵoj. Tial, ekzemple, Esperanto havas fonetikan ortografion. Tial en ĝi ĉiu elemento ricevis difinitan signifon kaj la tuta lingvo esence aglutinan karakteron. Per la

1. En eventualaj nacilingvaj tradukoj necesas ĉi tie prezenti koncize la gramatikan strukturon de Esperanto.


Др. ЭСПЕРАНТО.

МЕЖДУНАРОДНЫЙ ЯЗЫКЪ.


ПРЕДИСЛОВІЕ
и
ПОЛНЫЙ УЧЕБНИКЪ.

por Rusoj

Чтобы языкъ сталъ всемірнымъ, не достаточно назвать его такимъ.

Цѣна 15 копѣекъ.

ВАРШАВА.
Типо-Литографія Х. Кельтера, ул. Новолипки № 11.
1887.


Dr. ESPERANTO.

JĘZYK MIĘDZYNARODOWY.

PRZEDMOWA
i
PODRĘCZNIK KOMPLETNY.

por Poloj

Aby język stał się powszechnym, nie wystarczy nazwać go takim.

Cena kop. 15.

WARSZAWA.
Druk. i Lit. Ch. Keltera, ul. Nowolipie № 11.
1887.


Dr. ESPERANTO.

LANGUE INTERNATIONALE

PRÉFACE
et
MANUEL COMPLET

por Francoj

Pour qu'une langue soit universelle— il ne suffit pas de lui en donner le nom.

Prix 50 cent.

VARSOVIE.
En vente chez Gebethner et Wolff.
1887.


Dr. ESPERANTO.

INTERNATIONALE SPRACHE.

VORREDE
UND
VOLLSTÄNDIGES LEHRBUCH.

por Germanoj

Damit eine Sprache zur *Weltsprache* werde, genügt es nicht sie so zu *benennen*.

Preis 40 Pf.

WARSCHAU.
Zu haben in der Buchhandlung von Gebethner et Wolff
1887.

La unuaj lernolibroj de Esperanto: por Rusoj, Poloj, Francoj, Germanoj.

sistemo de afiksoj la Internacia Lingvo akiris vastajn eblecojn de subtila derivado. Tio unuavice kelkfoje iom ĝenas la t.n. „tujan kompreneblecon", per kiu kelkaj pseŭdosciencaj aŭtoroj de novaj projektoj blufas personojn jam parolantajn plurajn okcident-eŭropajn lingvojn, sed ĝuste tio donas al la lingvo plian facilecon kaj multe pli grandan, veran kaj realan, internaciecon: ne el vidpunkto de difinita grupeto da nacioj kaj de iliaj intelektaj satelitoj, sed el vidpunkto monda. Tio ankaŭ ebligas rapidan akiron de la lingvo kaj ĝian tujan praktikan uzon skribe, lege kaj parole ne nur en la t.n. okcidentaj landoj, sed sur ĉiuj kontinentoj; ne sole fare de kleruloj, sed ankaŭ fare de la plej ordinaraj homoj.

El la kvar konsistaj elementoj — radikaro, gramatiko, ortografio kaj prononco — nur unu estas pli proksima al la latinidaj lingvoj, dum la aliaj estas pli facile akireblaj por la apartenantoj de aliaj lingvaj komunaĵoj. Pro la internacieco de la radikoj, la latinidaj popoloj konas eble ĝis 80% de la radikaro sen lerni Esperanton, dum ĉe la slavaj popoloj tiu procento estas malpli alta. Same tiel ĉe la ĝermanaj nacioj. En Azio aŭ Afriko tiu procento estas ankoraŭ malpli granda. Aliflanke pro sia esence aglutina karaktero, Esperanto estas parenca al la lingvoj aglutinaj, ekzemple al la turkaj-tataraj, kaj tial ĝia sistemo de derivado estas proksima al la lingva sento de konsiderinda nombro da popoloj. Plue, pro la fonetika ortografio, Esperanto estas tre facila por multaj aliaj nacioj, kiuj aplikas la saman skribmanieron, inkluzive la slavajn naciojn. El vidpunkto de la prononcado, Esperanto certe estas pli facila por Poloj, Kroatoj, Slovenoj, Bulgaroj kaj tuta aro da aliaj, ol ĝi estas por la angle aŭ france parolantaj popoloj. Tio signifas, ke, se el vidpunkto de la radikaro (bazita ĉefe sur la antikvaj latina kaj greka nur pro la internaciiĝo de vortradikoj el tiuj lingvoj) Esperanto estas pli proksima al la latinidaj lingvaj komunaĵoj, el aliaj vidpunktoj ĝi estas pli proksima al aliaj popoloj. Ankaŭ en tiu senco Esperanto efektive estas lingvo internacia.

Sed Esperanto estas internacia ankaŭ pro alia kaŭzo. La naciaj lingvoj, eĉ kiam ili estas parte disvastiĝintaj ekster siaj naciaj teritorioj, restas naciaj kaj laŭ siaj historiaj tradicioj, kaj laŭ sia interna karaktero, kaj, ĉefe, laŭ sia socia portanto. Ĉiu nacio estas spirita proprietulo de sia nacia lingvo. La alinacianoj povas ellerni tiun lingvon pli aŭ malpli bone, sed ili ne sentas ĝin kiel sian. Male, la Internacia Lingvo estas propraĵo de internacia kolektivo, kaj ĉiu membro de tiu komunaĵo sentas ĝin kiel sian. Esperanto estas tial la sola vere internacia lingvo ankaŭ el vidpunkto de sia socia portanto. Tio siavice kontribuas al la facileco de la lingvo: oni pli facile ekmajstras lingvon, kiun oni mem mastras.

Fine, Esperanto estas internacia ankaŭ el la vidpunkto de la celo: servi kiel neŭtrala, supernacia instrumento de komunikado en mondaj kadroj.

Neniu nacia aŭ alia lingvo posedas tiujn tri esencajn elementojn de internacieco: interna strukturo, socia portanto kaj celo. Tial neniu nacia lingvo, eĉ ne la plej disvastiĝinta, povas esti nomata „internacia". Aliflanke, projekto de komuna lingvo povas esti nomata nek „internacia" nek „lingvo" antaŭ ol ĝi estas socie kaj internacie enradikiĝinta kiel efektiva instrumento de komunikado. Estas jam tempo, ke oni komencu nomi la aferojn laŭ iliaj veraj nomoj.

2.3.3 Socia Portanto

Se vere la efektiva portanto de la lingvo ne estas individuo, sed iu socia grupo, do kiu socia grupo estas la portanto de la Internacia Lingvo? Ekzistas triboj, popoloj, nacioj kaj ili havas siajn tribajn, popolajn, naciajn lingvojn. Sed kie estas — oni demandas — tiu „internacia popolo" kies lingvo estas internacia? Ĝi ne ekzistas kaj sekve ne povas ekzisti tia lingvo en la vera senco de la vorto.

La tuta konfuzo de tiu fundamente erara starpunkto estas, ke oni pretervidas tre simplan fakton, nome ke la samaj individuoj povas esti apartenantoj de diversaj sociaj grupoj aŭ kungrupiĝoj kun propraj lingvaj esprimoj. Se oni ĵetas rigardon al la lingva mapo, oni facile rimarkas, ke la samaj personoj, kiuj grandparte kiel aparta regiona socia grupo estas portantoj de iu dialekto, samtempe formas parton de la nacia kolektivo kaj *en tiu kvalito* prezentas la socian fonon de la nacia lingvo. La samaj personoj, plue, povas aparteni al iu profesio, okupo, religio, flanka interesiĝo kaj *kiel tiaj* konsistigas la grundon, el kiu kreskas specialaj lingvoformoj.

La grandega evoluo de ĉiuj ekonomiaj fortoj en la moderna epoko kun la rapidega progresado de la scienco ne nur kaŭzis la kreon de abunda lingvomaterialo kun internacia karaktero, sed ankaŭ ĉiam pli impete puŝas la homaron al multe pli forta integriĝo. Tiu objektiva evoluprocezo devis, interalie, naski novan senton de efektiva aparteno al la plej vasta socia unuo, kiu samtempe konkretiĝas kiel tia: al la homaro. Intelekto delikata kiel tiu de Zamenhof ne povis ne eksenti tion. Tute nature, do, li enspiris en la lingvon spiriton de humaneco kaj internaciismo, kiun li, eble ne tute trafe, nomis „interna ideo". La humaneca internaciismo estis kaj restas potenca idea fono de la lingvo. Ĝi donis al la Internacia

Lingvo koron kaj animon, tute specialan karakteron kaj apartan fizionomion, sen kiuj neniu lingvo povas vivi, kreski kaj maturiĝi.

Tiamaniere la Internacia Lingvo estis, ekde sia naskiĝo, la plej pura esprimo de vivanta sento de aparteno al la homaro. Kiel tia, ĝi, siavice, necese fortikigis kaj fortikigas tiun senton.

Do, la samaj personoj — certe ankoraŭ ne multnombraj — kiuj pro tio ne ĉesis esti apartenantoj de sia nacia aŭ regiona lingva komunaĵo aŭ de kiu ajn alia lingva kungrupiĝo, manifestas *plian aspekton* de sia socia personeco: la apartenon al la homaro. *En tiu aspekto* ili reale formas tiun *monde* internacian socian bazon, sur kiu kuŝas la Internacia Lingvo. Sekve, Esperanto ne estas paralela kun la dialektoj aŭ kun la naciaj lingvoj, nek adekvata al slangoj kaj al similaj lingvoformoj. Esperanto estas unu el la tri lingvoj troviĝantaj vertikale unu super la alia el vidpunkto de la *tri ĉefaj aspektoj,* en kiuj povas manifestiĝi la socia aparteno de la samaj personoj: al la regiono — la regiona dialekto; al la nacio — la nacia lingvo; al la homaro — la internacia Esperanto.

2.4 EVOLUO

Zamenhof asertis, ke Esperanto „devas kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiuj estas ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj". La antaŭvido de Zamenhof plene realiĝis. En sia pli ol 80-jara ekzistado kaj funkciado kiel vivanta lingvo Esperanto mirinde evoluis.

La signifo de kelkaj radikoj estis modifita ĉu per larĝigo de la senco aŭ metaforigo, ĉu per malplivastigo kaj plipreciziĝo. Pli mallongaj formoj kelkfoje anstataŭis la pli longajn. Ĉiuj eblecoj, kiuj estas entenataj en la strukturo de la lingvo, sed kiujn en la komenco oni ne atentis, estis analoge kaj logike ĉiam pli utiligataj.

La evoluo de Esperanto precipe manifestiĝis en la plimultiĝo de la radikaro. En la jaro 1887 la unua vortareto konsistis el 931 elementoj (radikoj, afiksoj, finaĵoj, propraj nomoj) en la germana eldono, sed nur 927 en la rusa, unue aperinta. La *Plena Vortaro Rusa-Internacia* (1889) alportis konsiderindan riĉigon al la lingvo, sed nur parto de ĝia vortmaterialo retroviĝis en la kvinlingva *Universala Vortaro* de 1893, kiu enhavis 2.644 erojn (2.628 en la alfabeta vicordo). La *Plena Vortaro* de la jaro 1954 enhavas 7.866 vortradikojn, el kiuj oni povas formi minimume 80.000 vortojn. Multaj aliaj vortradikoj troviĝas en la teknikaj kaj fakaj terminaroj. La Plena Ilustrita Vortaro, publikigita en 1970, enhavas entute ĉ. 16.000 vortradikojn, inkluzive grandan nombron da fakaj kaj teknikaj terminoj. El tiu radikaro oni povas formi ĉ. 160.000 vortojn, kio metas Esperanton inter la plej riĉajn lingvojn el vidpunkto de la vortprovizo.

2.4 EVOLUO

Malgraŭ tiu grandioza evoluo, kiu faras la lingvon delikata instrumento por esprimi eĉ la plej nuancitajn pensojn, Esperanto neniom perdis de siaj simpleco, flekseblеco kaj facileco. La fundamentaj reguloj de la gramatiko restis la samaj. Aliflanke, por la praktika aplikado de la lingvo en la ĉiutaga vivo ne estas necesaj pli ol 700 aŭ 800 vortradikoj, el kiuj oni povas formi 7.000 aŭ 8.000 derivitajn vortojn. Depende de la individua klereco tiu ĉi nombro povas esti pli aŭ malpli granda. La samo okazas ankaŭ en la naciaj lingvoj. Neniam la individua vortprovizo egalas al la tuta vortaro de iu lingvo.

La facileco de Esperanto ne konsistas kaj ne povas konsisti en tio, ke en ĝi oni havu limigitan nombron da vortoj, kiel pensas kelkaj personoj, se efektive novaj vortradikoj estas necesaj. La facileco de Esperanto konsistas en ĝia simpla gramatika strukturo, en la logika sistemo de afiksoj, en la fakto, ke ĉiu persono, ellerninta ĝin, sentas ĝin ne kiel fremdan, sed kiel sian propran lingvon.

Esperanto ne nur konservis, sed eĉ fortikigis sian unuecon. La personoj, kiuj akceptas la Internacian Lingvon, faras tion ne por enigi en ĝin la mallogikaĵojn de siaj naciaj lingvoj, por infekti ĝin per naciaj idiotismoj kaj per aliaj naciismoj, kaj tiamaniere rompi ĝian unuecon, sed, male, *por interkompreniĝi per unu sama komuna lingvo.* Tiu ĉi psikologia stato, tiu ĉi volo konservi la lingvan unuecon, faras ke Esperanto nek „disfalis en dialektojn", kiel kelkaj lingvistoj erare profetis, nek povos disfali. La plivastiĝo de la kampo, sur kiu Esperanto estas praktike utiligata, kaj la nombra kresko de personoj parolantaj la lingvon, kaŭzis plimultiĝon de ĉiaspecaj internaciaj kontaktoj inter tiuj personoj kaj, rezulte, kontribuis al ĉiam pli granda fortikigo de la lingva unueco, tute speciale rilate la prononcadon. Al la evoluo de Esperanto kaj al firmigo de ĝia unueco precipe kontribuis kaj kontribuas la verkistoj, poetoj, sciencistoj, ĵurnalistoj kaj aliaj, kiuj verkas en la Internacia Lingvo. Tiurilate ilia respondeco estas pli ol granda: ĝi estas decida. Al la evoluo de Esperanto kontribuas ankaŭ la oratoroj, prelegantoj kaj ĉiu alia aktiva uzanto de la lingvo en societoj kaj aliaj organizaĵoj, dum kongresoj kaj konferencoj, en korespondado, amikaj konversacioj kaj eĉ en la privata, familia vivo. Elstaran signifon havas la radio-elsendoj, nombre tre kreskintaj en la lasta jardeko, precipe la ĉiutagaj de la fortaj stacioj, aŭdeblaj en multaj landoj.

La evoluo de la Internacia Lingvo ne estas diktata de supre, sed ĝi okazas de malsupre, de la personoj kiuj praktikas ĝin, kvankam, se necese, la Akademio de Esperanto povas kaj devas interveni per

rekomendoj. Ne ekzistas, do, kia ajn principa diferenco inter la maniero, laŭ kiu evoluas kiu ajn literatura lingvo, kaj la maniero, laŭ kiu evoluas Esperanto. La Internacia Lingvo ja evoluas, sed ĝi evoluas unuece. Okazas precize la malo de tio, kion ignorantoj de bazaj faktoj eĉ hodiaŭ malprave asertas.

Same tiel ne ekzistas principa diferenco inter la naciaj literaturaj (normaj) lingvoj kaj Esperanto koncerne la t.n. „naturecon" aŭ „artefaritecon". La Internacia Lingvo estas tiel „artefarita", kiel ĉiu ajn literatura lingvo, se sub tiu absolute maltaŭga esprimo, kiam ĝi estas aplikata al la lingvo, oni komprenas „kreata de la homo". Sekve, se, parolante pri la angla, franca aŭ aliaj lingvoj, oni ne donas al ili la epiteton „artefarita" aŭ kiun ajn alian simile maltaŭgan, kial oni faras tion parolante pri la Internacia Lingvo, se ne por elvoki, intence aŭ ne, superfluajn konfuzon kaj miskomprenon? Tia nomado naskas nur ĥaoson, kiu malhelpas la normalan disvastiĝon de la Internacia Lingvo en la larĝaj popoltavoloj. De la alia flanko ĝi kreas ĉe la personoj, kiuj komencas lerni la lingvon, kelkfoje eĉ ĉe progresintoj, ian komplekson pri kvazaŭa malpli granda valoro de Esperanto kompare kun la naciaj lingvoj. La vastiĝanta uzo de Esperanto en la internacia praktiko montris, ke ĝi taŭgas ĝis la plej alta grado kiel instrumento de komunikado, ke ĝi estas eĉ relative perfekta. Dependas de ĉiu unuopulo, ke li plene ekregu tiun mirindan instrumenton. Dependas nur de li, ĉu en liaj manoj ĝi fariĝos potenca komunikilo kaj esprimilo, aŭ ĝi estos nur pala, sensanga, senkolora kaj kripla balbutilo.

Inter la naciaj kaj la Internacia Lingvo ekzistas nur unu gravega diferenco, nome diferenco de la celo, al kiu ili servas: dum la naciaj lingvoj havas la taskon kontentigi la bezonojn de komunikado kaj pensado en kadroj naciaj, la Internacia Lingvo liberigas la penson de la nacilingvaj ĉenoj kaj flugigas ĝin libere de lando al lando, de nacio al nacio tra la tuta mondo. Kiam oni amase eklernos la Internacian Lingvon en ĉiuj lernejoj de la mondo, dediĉante al ĝia studo nur kvaronon de la tempo, kiun oni dediĉas ne al lernado de kiu ajn fremda nacia lingvo, sed al la lernado de la propraj naciaj lingvoj, tiam la homaro ĝisvivos grandegan pozitivan spiritan revolucion kaj tiam plene evidentiĝos la fruktodona kaj morala kaj intelekta efiko de la Internacia Lingvo.

2.5 ESENCA BIBLIOGRAFIO

Tiu ĉi ĉapitro estas bazita plene sur la verko:
Lapenna, I., *Retoriko*. 3-a eldono. Rotterdam 1971.

Sekve, por la fontoj oni bv. konsulti la menciitan libron, precipe la piednotojn al ĉapitroj III - IV kaj VI.

ĈAPITRO 3

LA ESPERANTA KULTURO

3.1. KULTURO KAJ TRADICIO

La Esperanto-Movado ne estas nur lingva movado. Esence, ĝi estas kultura movado kun propraj historio kaj tradicio. La portantoj de tiu kulturo estas diversnaciaj homoj, kiuj uzas komunan komunikrimedon: La Internacian Lingvon. Tiun kulturon kondiĉas, unuflanke, la socia konsisto de la portanta kolektivo, aliflanke ĝia organiznivelo. Tio eksplikas la fakton, ke Esperanto evoluas, ja, kiel ĉiuj lingvoj, tra la vojo de arkaismo-neologismo, sed la maniero, laŭ kiu ĉi tiu evoluvojo praktike manifestiĝas, estas diferenca disde tiu de la ceteraj lingvoj.

La regionaj dialektoj estas plejparte idiomoj nur parolataj. Je la nivelo de mezklera parolanto, ili estas neflegataj, pli-malpli nur elementaj esprimiloj kun limigita kultura signifo, sed tamen kun forta afekcia karaktero. La naciaj lingvoj estas idiomoj parolataj kaj skribataj, kaj tiuj du uzoformoj forte influas unu la alian. Ili estas lingve flegataj, kaj iliaj esprimkapablo kaj kultursignifo estas senkompare pli ampleksaj kaj influaj. La Internacia Lingvo estas ĝis nun, kompare kun la naciaj lingvoj, nur relative malmulte parolata. Ĝi, do, estas idiomo ĉefe skribita. Sed jam dekomence, kelkajn jarojn post la apero, ĝi tuj montris signojn de evoluo en la direkto de kreiĝo de internacilingva „parola" kulturo, kiu, cetere, estas nepra kondiĉo por plua firmiĝo kaj valoriĝo de ĝia tradicio.

Oni povas konstati, ke la Internacia Lingvo havas adekvatan esprimkapablon sur ĉiuj kampoj kaj ke ĝi estas facile komparebla al

kiu ajn nacia lingvo. Krome, ĝi posedas konvenan afekcian karakteron. Sufiĉas citi tri homojn, en kies verkoj tiu afekcia karaktero plej bone esprimiĝas: L. L. Zamenhof, E. Privat, Julio Baghy. La kultursignifo de Esperanto estas do tutprave jam nun konsiderata kiel universala, kvankam ĝia socia portanto estas ankoraŭ limigita, kaj space disigita, ĉar la homaro troviĝas nur survoje al sia integriĝo: tio reflektiĝas en la Esperanto-Movado je la niveloj lingva, kultura kaj organiza.

3.2 KOLONOJ DE LA ESPERANTA KULTURO

3.2.1 Enkonduko

Formale aŭ neformale ĉiu lingvo aŭ dialekto, depende de la nivelo de la socia organizo de ĝiaj parolantoj, havas instituciojn, kiuj flegas la malnovajn kulturajn valorojn, helpas la ekeston de novaj kaj konscie aŭ nekonscie kundeterminas la formiĝon de „normo". Temas pri procezo, kiu konsistas el la kunagado de pluraj institucioj: la rezultanto de tiuj malsamaj fortoj estas la starigo de „normo" je la lingva, kultura kaj literatura niveloj. Tiuj institucioj estas multspecaj kaj malsamaj: ili dependas de la socia organizo, kiun siavice kondiĉas la evoluo de la produktorimedoj kaj sekve la strukturo de la socio mem: povas temi, do, pri klaso, profesio, familio, lernejo, gazetaro, ŝtato, aŭ en aliaj kazoj, pri grupo, sekto, klano, tribo, ktp.

Io analoga ekzistas ankaŭ rilate Esperanton: ĝia evoluo kaj tradiciestiĝo estas determinataj de „tradiciaj kolonoj": la movado, la literaturo, la esperantologio, la lingvaj institucioj, k.a. Ili defendas ĝenerale la ĝisnunajn atingojn, sed en difinita momento ili iĝas ankaŭ nov-instigaj institucioj, kiam ili konscie aŭ nekonscie akcelas la estiĝon de la esperantlingva parola kulturo. Tiu parola kulturo estas la sola garantio, ke la lingvo pluvivu, ke ĝia literaturo kaj vortaro daŭre riĉiĝu per novaj taŭgaj radikoj, ke la radikoj mem nuanciĝu ĉiam pli per komuna akcepto de afekciaj kromsignifoj (elvokiveco), de unuece komprenataj kaj sentataj idiotismoj.

3.2.2 Organizita Movado

La Esperanta kulturo ĉiam vivis, post la atingo de difinita evolunivelo, en multflanka simbiozo kun la organizita Movado. Pere de siaj ampleksaj praktikaj servoj kaj kulturaj agadoj UEA altiris homojn kaj donis prestiĝon al la lingvo; aliflanke, pro la kultura signifo de Esperanto, UEA ludas elstaran rolon ankaŭ sur kultura kampo, precipe post la Dua Mondmilito. Kompreneble, necesas preni en kon-

sideron la aliajn gravajn organizaĵojn, el kiuj konsistas UEA, nome la landajn kaj fakajn asociojn, la lokajn grupojn, la specialigitajn organizaĵojn kaj diversajn aliajn instancojn. Aparte menciinda estas TEJO, la junulara sekcio de UEA. Ekster la kadroj de UEA gravaj estas unuavice SAT, kiu havas sian propran ideologion, kaj la laboristaj landaj Esperanto-organizaĵoj [1].

3.2.3 Esperanta Libraro

Tre gravan signifon havas la Esperanta libraro por la firmigo kaj la normigo de tradicio. Sen la skriba literaturo, kun kultura signifo, kultura kaj tradicia normoj neniam estus povintaj ekesti: Esperanto neniam estus transformiĝinta en kompletan, ankaŭ parolatan lingvon, sed estus restinta nura planlingva projekto.

En 1888, do nur unu jaron post la apero de la unua lernolibro, jam ekzistis 29 esperantlingvaj libroj.

En 1895 la nombro estis 75 verkoj: 47 diverslingvaj lernolibroj; 8 propagandaj broŝuroj; 12 beletristikaĵoj, el kiuj kelkaj estas ankoraŭ bone konataj: *Hamleto* en la traduko de L. L. Zamenhof; *La Neĝa Blovado, La Gefratoj, Janko Muzikanto, La Liro*, k.a., tradukitaj aŭ redaktitaj de A. Grabowski; *Princino Mary*, tradukita de E. de Wahl; *Renaskita Manfred* en traduko de Majnov; tradukaĵo-adapto el Ezopo, farita de Ivan Lojko; *Demono, Boris Godunov*, tradukitaj de V. Devjatnin; k.a.

En 1912 la librokvanto jam altiĝis al 1.989 titoloj.

Kaj tiu libroeldona aktivado estas konstanta: inter 1961 kaj 1969 aperis 416 verkoj (el kiuj 75 aperis dum 1969). Ilin oni povas klasigi jene:

	Nombro de verkoj	el ili orig.	paĝoj
romanoj	80	23	11.324
poezio	42	19	7.322
aktualaĵoj	134	4	8.181
esperantologio	35	33	3.708
religio	43	7	3.643
dramoj	4	1	345
ĝenerala kulturo	10	6	1.090
scienco	23	10	1.567
porinfana literaturo	36	5	962
kantaroj	9	1	376
sume	416	109	38.518

1. Detaloj pri UEA kaj la asocioj apartenantaj al ĝi, pri SAT kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj troviĝas en la Kvara Parto.

3.2.4 Esperantaj Eldonejoj

3.2.4.1 *La Komenco.* — La kultura vivo de Esperanto havis ĉiam „eldonajn centrojn". Ili signas la lokon de kultura kaj/aŭ lingva plejaktivado. La eldonejo, en kiu L. L. Zamenhof aperigis la unuajn librojn (lernolibrojn kaj literaturaĵojn, kiel *La Neĝa Blovado, La Gefratoj,* k.a.), estis la presejo Kelter, en Varsovio. Post la centrigo de la Movado en Nürnberg, kaj la tiea apero de *La Esperantisto,* tien migris ankaŭ la eldoneja centro: la eldonfirmo W. Tümmel aperigis esperantlingvajn verkojn ĝis 1903.

3.2.4.2 *Antaŭ la Unua Mondmilito.* — Gravan antaŭenpuŝon por Esperanto signifis la kontrakto inter L. L. Zamenhof kaj Hachette, pariza eldonfirmo, subskribita en 1901. Hachette iĝis grava eldonejo ankaŭ por Esperanto: ĝi aperigis la verkojn de L. L. Zamenhof, la *Kolekton Aprobitan,* la *Kolekton de La Revuo,* kaj kelkajn periodaĵojn. Kontraŭ pretendata (sed neniam fakte ekzistinta) monopolo batalis konkurenca pariza eldonejo, gvidata de kelkaj lingve tre konservativaj homoj: Presa Esperantista Societo, kiu publikigis valorajn librojn kaj propran gazeton.

En 1918, kun la fino de la franca periodo de Esperanto, Hachette ĉesis interesiĝi pri esperantlingva eldonado. La stokon de la jam pretaj libroj kaj la rajton pretigi novajn eldonojn aĉetis la ĵusfondita Esperantista Centra Librejo.

3.2.4.3 *Intermilita Epoko.* — Intertempe komencis aktivi du iom gravaj eldonejoj: ili ludis signifan rolon ĉefe dum la unuaj postmilitaj jaroj. Temas pri F. Hirt kaj Filo, en Leipzig, kaj pri F. Ellersiek en Berlino.

Sed la plej grava ĉi-perioda eldonejo estis sendube Literatura Mondo, kiu aperigis lingvosciencajn verkojn kaj librojn belliteraturajn de aŭtoroj ligitaj al la tiama „Budapeŝta Skolo", kiu, kiel konate, praktike kreis la modernan esperantlingvan literaturon.

Apud la multmerita Literatura Mondo, kiu malaperis en 1949, kreiĝis jam frue aliaj entreprenoj. Unu el ili estas Heroldo de Esperanto, hodiaŭ ankoraŭ aktiva.

Ni ne rajtas forgesi la laboristajn eldonejojn: en la lastaj antaŭmilitaj jaroj aktivis en Nederlando la eldonejo Wiebe Nutters, sed la fondo de SAT, en 1921, permesis kaj faciligis la aperon de laborista literaturo. Cetere, SAT ne limigis sin je laborista literaturo: ĝi eldonis ankaŭ beletristikajn kaj lingvistike valorajn verkojn, inter kiuj troviĝas *Plena Vortaro* kaj *Plena Ilustrita Vortaro,* aperinta en 1970. Malaperis la iom mistera eldonejo EKRELO, kiu, inter 1930 kaj 1936, unue en Leipzig, poste, sekve de la hitlera malpermeso, en Amster-





Supre: La sidejo de Presa Esperantista Societo, kiu antaŭ la Unua Mondmilito eldonis valorajn librojn kaj aperigadis propran gazeton.

Maldekstre: Vilmos Bleier, administranto, teknika prizorganto kaj ĉefposedanto de la eldonejo Literatura Mondo.

Sube: La eldonisto Juan Régulo-Pérez ĉefrolas en la eldona aktiveco post la Dua Mondmilito.



dam kaj Moskvo, eldonis komunistan literaturon, beletristikon (ekz. la romanon de Varankin) kaj lingvistike valorajn studojn (ekz. kelkajn de Ernest Drezen).

3.2.4.4 *Hodiaŭa Situacio.* — La nuna situacio estas resume la jena: gravaj eldonejoj estas UEA, KOKO (Danlando), Pirato (Japanio), kaj ĉefe Stafeto (Hispanio), kiu lanĉis la poetojn kaj preskaŭ ĉiujn prozverkistojn de la t.n. „Skota Skolo", t.e. de la literaturista grupo, kiu rigardas sin idee kiel sekvanton de la antaŭa „Budapeŝta Skolo", cetere ne malaperinta. Signifa eldona entrepreno estas la serio „Oriento-Okcidento", kreita de UEA por faciligi la reciprokan konigon de kulturaj valoroj. Preskaŭ ĉiuj gravaj esperantlingvaj eldonejoj partoprenis pere de libro-eldono: ekde 1961 aperis 12 titoloj, publikigitaj de Eldona Societo Esperanto, Japana Esperanto-Instituto, UEA, Fondumo Esperanto, Stafeto, Pirato, KOKO, TK, kaj neesperantista firmo: SIEI (Milano).

3.2.4.5 *Laŭlanda Resumo.* — *Hispanio:* Gigantas la eldonejo Stafeto, direktata de la aktiva Prof. D-ro J. Régulo-Pérez.

Francio: Krom la ĉiam aktiva SAT, en la lastaj jaroj fondiĝis aliaj eldonejoj, el kiuj lingve kaj literature elstaras Esperantaj Francaj Eldonoj.

Britio: The Esperanto Publishing Company, aktiva ĉefe tuj postmilite.

Italio: Ekzistas ankoraŭ malnova eldonejo, fondita antaŭ la Unua Mondmilito, A. Paolet, kiu sur literatura kampo tamen neniam estis tre aktiva.

Nederlando: Elstaras nuntempe la aktivado de UEA kaj de ĝia Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo. Ne tiom nova eldonejo, cetere de antaŭ kelkaj jaroj silenta, estas Muusses, kaj la Libroservo de FLE. Pli aktiva antaŭ la Dua Mondmilito estis la Internacia Esperanto-Instituto. Relative nova eldonejo estas Frisa Esperanto-Rondo.

Kanado: Aktivas, ĉefe sur lingva kaj porinfana kampo, Esperanto Press.

Germanio (FRG): La iom malnova eldonejo S. Ziegler ne plu aktivas. Aktiviĝis tamen nova eldonejo L. Pickel en Nürnberg.

Danlando: La ĉefa literatureldonejo estas sendube KOKO. Tamen tre entreprenema montriĝis la eldonejo TK (Torben Kehlet), transprenita de UEA en 1973. Ankoraŭ ekzistas Libroservo de CDEL kaj Dansk Esperanto-Forlag.

Jugoslavio: La du ĉefaj eldonejoj estas sendube la Eldona Sekcio de Slovenia Esperanto-Ligo kaj Kroatia Esperanto-Ligo.

Ĉinio: Aktivas la libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Fremd-

lingva Eldonejo en Pekino (ĉefe pri politikaĵoj).

Vjetnamo: Tre aktiva sur lingva, literatura kaj politika kampoj estas la nordvjetnama Fremdlingva Eldonejo en Hanojo.

Svedio: Aktivas la multmerita Eldona Societo Esperanto.

Brazilo: Dum multaj jaroj abunde eldonis Asocio Esperantista de Rio de Janeiro. Nuntempe plej aktivas sur beletra kampo la Kultura Kooperativo de Esperantistoj (Rio de Janeiro) kaj la Spiritista Federacio.

Hungario: Novajn librojn eldonas kaj malnovajn reeldonas eldonejo Corvina. Aliaj aktivaj eldonejoj estas Kultura kaj Hungara Esperanto-Asocio.

Sovetunio: Ĝis nun plej aktiva montriĝis la eldonejo Soveta Enciklopedio.

Finnlando: Sur lingva, lingvistika kaj ankaŭ sur literatura kampo aktivas Fondumo Esperanto.

Pollando: Esperantlingve distingiĝis la eldonejo Ars Polona kaj Pola Esperanto-Asocio.

Japanio: Multaj eldonejoj aktivis kaj aktivas: tiamaniere kreiĝis la bazoj por aparta „japana" literatura skolo. Kulture gravaj estas sendube Pirato kaj Japana Esperanto-Instituto. Citindaj estas ankaŭ Oomoto, Japana Esperanta Libro-Kooperativo, Amo-Akademio, Daigakusyorin, Kosmo kaj la modesta sed agema L'Omnibuso.

Belgio: Ankoraŭ aktivas en Bruselo la nun malnova eldonejo Heroldo de Esperanto, kiu estis unue en Germanio, post 1936 en Nederlando.

Fakaj Eldonejoj. — Preskaŭ ĉiuj fakaj asocioj eldonis kaj eldonas proprajn librojn: i.a. ISAE, IKUE, KELI, UMEA, IFEF, k.a. Aparte aktivaj estas la jenaj religi-filozofiaj eldonejoj: Ekumena Esperanto (Svislando), Internacia Katolika Informejo (Nederlando), Fratoj de l'Karitato (Belgio), Martinus-Instituto (Danlando), kaj Oomoto (Japanio).

3.2.4.6 *Konkludo.* — Ni konstatas, ke tie, kie plej vivbolas la kultura movado esperantlingva, la eldonejoj multiĝas kaj aktiviĝas. Ekzistas do inter ambaŭ manifestacioj reciproka rilato.

3.2.5 Esperantaj Bibliotekoj

Gravan signifon, el kultura vidpunkto, havas la bibliotekoj, publikaj aŭ privataj, kun esperantlingva materialo. Internacilingva interesulo, ankaŭ neesperantisto, perceptas propraokule, multe pli bone ol per mil teoriaj argumentoj, la signifon de la lingvo. Cetere, ili estas ankaŭ dokumento-deponejoj kaj konsultejoj por historiistoj,

kiuj studas la Esperanto-Movadon, ĝian literaturon, aŭ la historion de la problemo de lingvo internacia [2].

3.2.6 Belartaj Konkursoj

3.2.6.1 *Enkonduko.* — Jam frue en la historio de la Esperanto-Movado la organizita movado aŭ la mecenateco de unuopuloj (kazo iom pli malofta, sed ne senekzempla) faciligis la starigon de literaturaj konkursoj. Ili ĉiam estis tre ŝatataj pro la prestiĝa signifo, kiun ili havis. Temas ja pri distingopremioj por merita aŭtoro aŭ pri instigilo al juna talenta artisto por plua verkado.

3.2.6.2 *Historia Skizo kaj Hodiaŭa Situacio.* — La unuan beletristikan konkurson organizis la revuo *Lingvo Internacia* en 1896. La ekzemplon sekvis *L'Espérantiste*, kiu ekde 1900 organizis literaturajn konkursojn pri originalaj prozo kaj poezio, kaj pri tradukaĵoj. Ankaŭ *La Revuo* ĉiujare organizis, inter 1906 kaj 1914, literaturan konkurson kun premioj. Inter la tiamaj premiitoj troviĝas kelkaj hodiaŭ ankoraŭ konataj nomoj: Paul de Lengyel, S. Meyer, K. M. Nordensvan, Georgi Atanasov. Male, multaj plene forgesiĝis: ekz. Hilda Cederblad, Zabilon-d'Her, Axel Hasselrot, K. Boguŝevič, T. Ŝčavinskij, k.a. Antaŭ la Unua Mondmilito kaj kelkajn jarojn post ĝi ekzistis ankaŭ la Floraj Ludoj, organizitaj iom en la spirito de la mezepokaj katalunaj (okcitanaj) literaturaj turniroj, kies gajnintojn oni proklamis reĝoj kaj reĝinoj. Konataj kronitoj estis i.a. Marie Hankel, Edmond Privat, Clarence Bicknell.

Jam en la periodo inter 1919 kaj 1939 vivis kutimo okazigi dum la Universalaj Kongresoj literaturajn vesperojn, kie la aŭtoroj mem prezentis proprajn verkojn.

Post la Dua Mondmilito literatura konkurso okazis dum la UK de 1948, sed la unua Belarta Konkurso en la aktuala formo okazis nur en 1950; ekzistas tri premioj (unua, dua kaj tria), al kiuj oni aldonis poste la premion „nova talento", por 4 branĉoj: originala poezio, traduka poezio, originala prozo, originala drameto. La komisiono rajtas aldoni novajn konkurso-branĉojn (ekz. fotografarton, desegnon, ktp.). Multaj hodiaŭ ŝatataj verkistoj komencis sian karieron tiel, kaj nur poste aperigis propran originalan libron: i.a. Reto Rossetti, William Auld, Poul Thorsen, Marjorie Boulton, Ŝtefo Urban.

Aliaj, male, ne atingis libro-aperigon, kvankam ili estas bone konataj kaj literature tre ŝatataj: i.a. A. D. Foote, Z. Takač, French, A. Samyn, L. H. Knoedt, B. Vančik.

La esperantlingvaj verkistoj tre aprezas la belartajn konkursojn.

2. Detalojn v. en Ĉap. 20.3.

Tion montras ankaŭ ilia multnombra partopreno en la konkursoj [3].

Kvankam la Belartaj Konkursoj de UEA estas la plej konataj, ili ne estas tamen la solaj: J. Comella (Kataluno) starigis la premion Comella-Bassols por la plej gaja originala novelo. Krome, ekzistas ankaŭ multaj premioj sur nacia nivelo.

3.2.7 Kulturaj Centroj

Preskaŭ en ĉiu lando estas centro por la flego de la kulturo kaj de la lingvo Esperanto. Kelkaj el tiuj centroj organizas ankaŭ Esperanto-kursojn (multaj limiĝas ja al tiu celo), kelkaj eldonas revuon, aŭ aperigas librojn. Plej gravaj estas, tamen, la internaciaj centroj.

Unu el la unuaj, kaj certe unu el la plej famaj, estas la Internacia Esperanto-Instituto, fondita en Hago, en 1930, de Andreo Cseh (1895-), propagandisto kaj eltrovinto de originala „natura" instrusistemo por Esperanto.

Alia tre fama centro, tamen kun alispeca karaktero, estas la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, fondita en Londono la 1-an de januaro 1952 fare de Prof. Ivo Lapenna, kiel institucio de UEA. Ĝi eldonis, angle kaj esperantlingve, rimarkindan nombron da utilaj kaj valoraj dokumentoj pretigitaj de pluraj aŭtoroj. Ĝi okupiĝas pri studoj, enketoj, statistikoj, bibliografioj, dokumentado pri la internacilingva problemo kaj pri ĝia solvo, Esperanto. Ĝi publikigis ankaŭ kolektivajn studvolumojn: *La Internacia Lingvo (Faktoj pri Esperanto)*, 1954, kaj *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro*, 1960, ambaŭ redaktitajn de I. Lapenna [4].

Kulturaj centroj ekzistas, kiel dirite, ankaŭ en aliaj landoj, ekzemple en Francio (Grésillon), Svislando (La Sagne), Japanio (Tokio).

3.2.8 Lingvaj Institucioj: La Akademio

La ĉefa lingva institucio de la Movado estas la Akademio, kies tasko estas „konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon" (el la Statuto).

En 1905 L. L. Zamenhof proponis krei lingvokontrolajn instituciojn. La Kongreso tutsimple kreis 96-personan Lingvan Komitaton (LK), kies provizora prezidanto fariĝis L. L. Zamenhof mem. La postan jaron, tamen, estis akceptita la statuto, kaj enoficigita nova prezidanto: Rektoro Boirac. La nombro de la membroj jam estis kreskinta: ili estis 102 el 26 nacioj. Oni dividis la laboron laŭ sekcioj: Komuna Vortaro, Gramatiko, kaj Teknika Vortaro. En diversaj periodoj funkciis, krome, jenaj sekcioj: Internaj Aferoj, Propraj Nomoj, Vortfarado, Elparolo kaj Kontrolo. La tiama Prezidanto prezentis „Deklaron pri

3. Detalojn v. en Ĉap. 11.2.

4. Pri CED v. Ĉap. 20.2.

la Rolo de la Lingva Komitato", kiu komenciĝas jene:

> La tasko de la LK estas zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evolucion. Ĝi do esploras ĉiujn lingvajn demandojn kaj solvas ilin laŭ la supre diritaj principoj. Neniel la Fundamento (de Esperanto) nek la LK povas esti baro por la normala evolucio de la lingvo, kiun ili, kontraŭe, certigas.

Sed la multmembra LK estis nur malfacile kaj peze laborkapabla. Ĝi devis elekti proprasine laborkomitaton de 12 membroj, kiun oni nomis Akademio (1908).

La oficiala informilo de la LK kaj de la Akademio estis la *Oficiala Gazeto* de la pariza Centra Oficejo (1908-1922). Poste, la decidoj de la Akademio aperis cirkulere *(Oficialaj Informoj)*. Laŭnecese la Akademio havas la rajton eldoni propran bultenon: *Oficiala Bulteno.* Unu el la plej gravaj laboroj pretigitaj de la Akademio estis la korekto kaj kompletigo de la *Universala Vortaro:* la unua aldono aperis en 1909, la dua en 1919, la 3-a en 1921-22, la 4-a en 1929, la 5-a en 1934, la 6-a en 1935 kaj la 7-a en 1958. La Akademio studis ankaŭ diversajn lingvajn demandojn, problemojn pri vorto-teorio kaj terminologio.

Post la Dua Mondmilito, en 1946, cirkulero dissendita cele al restarigo de la LK havis malsukceson: el 102, nur 48 LK-anoj respondis. Fine, en 1948 oni restarigis lingvan institucion, kiun oni nomis Akademio: ĝi konsistas el maksimume 50 membroj, do eblas pli racia divido de laborfortoj. En 1964 la Akademio akceptis novan Statuton [5].

3.2.9 Esperantologia Literaturo

3.2.9.1 *Enkonduko.* — Lingvo-esploro estas necesa. Esperantologio studas la Esperantajn lingvon kaj kulturon. Ĝi esploras latentajn internajn strukturojn de la lingvo, eblecojn de novaj lingvoformoj, jam tradiciiĝintan lingvouzon kaj similajn demandojn. La rezultoj de Esperantologio aperis en libroj, broŝuroj, revuoj kaj kursoj. La unua universitatnivela kurso pri la rilatoj inter Esperanto kaj la lingvoscienco okazis en 1908 en Finnlando. La temo estis *Esperanto kaj Lingvistiko,* kaj la preleganto estis la fama lingvisto Gustav J. Ramstedt.

3.2.9.2 *Bibliografio.* — Resumo de la dekuma klasifiksistemo estis publikigita de M. C. Butler en 1927. Apartajn sistemojn por klasigi esperantaĵojn surbaze de la dekuma sistemo proponis generalo

5. Pliaj detaloj troviĝas en Ĉap. 20.1.

Sebert (1910) kaj M. C. Butler (1950). Bibliografiajn katalogojn pri Esperantaj eldonaĵoj aperigis Georg Davidov (katalogo de la Davidov-a Biblioteko: Volumo I 1887-1908 [1908] kaj Volumo II 1888-1911 [1911]), Hugo Steiner *(Katalogo de IEMW,* Volumo I, kun esperantaĵoj, 1957; Volumo II, kun interlingvistikaĵoj, 1958; Volumo III, kun laŭnoma alfabeta katalogo A—L, 1969), György Gyuris *(Katalogo de la Hungarlanda Esperanto-Biblioteko,* 1967). La verko de P. E. Stojan, *Bibliografio de Internacia Lingvo,* 1929, represita en 1973, enhavas provon starigi kompletan Esperantan bibliografion. Kvankam la tieaj citaĵoj (6.333, plus statistikoj kaj indeksoj) atingas nur la jaron 1929, ĝi estas verko nepre bezonata por serioza interesiĝanto.

Bona *Enkonduko en la Librosciencon de Esperanto,* verkita de R. Haupenthal, aperis en 1968. Multmeritaj estas la bibliografioj, kiuj pritraktas apartajn temojn: pri esperantlingvaj tradukaĵoj el la dana verkis bibliografion P. Thorsen en 1952; pri internacia lingvo en Jugoslavio verkis M. Gjivoje (1954, 1964, 1967); pri esperantologio ekzistas la studo de P. Neergaard *La Esperantologio kaj ties Disciplinoj* en la verko *Tra Densa Mallumo,* 1942; pri la religia literaturo en Esperanto Karl-Olof Sandgren verkis bibliografian studon en 1970.

3.2.9.3 *Historio de Esperanto.* — La ĉefaj verkoj pri la frua tempo de Esperanto estas la verkoj de L. L. Zamenhof mem: la *Originala Verkaro* (red. J. Dietterle, 1929) kaj *Leteroj de Zamenhof* (red. G. Waringhien, duvoluma, 1948). Gravan helpon prezentas ankaŭ la biografioj de Zamenhof. Inter ili, citindas *Vivo de Zamenhof,* de E. Privat, 1920 (5-a eld. 1967) kaj *Zamenhof,* de M. Boulton, 1962. Ekzistas ankaŭ historioj de Esperanto: unu el la unuaj estis *Historio de Esperanto 1887—1912* de Z. Adam (ps. de Adam Zakrzewski), 1912, bedaŭrinde delonge elĉerpita. Ankoraŭ haveblaj, kaj frukto de rekta studo ĉe la fontoj kaj de travivo, almenaŭ parte, estas la du volumoj de *Historio de la Lingvo Esperanto* de Edmond Privat (Volumo I, 1887—1900: 1912 kaj 1923; Volumo II, 1900—1927: 1927). La unua provo organike kaj dokumente prezenti la historion de Esperanto estis farita de Léon Courtinat, en lia trivoluma *Historio de Esperanto 1887—1960* (I: 1964; II: 1965; III: 1966). Malfeliĉe tiun ampleksan verkon fuŝas tro multe da lingvaj kaj filologiaj eraroj, kiuj igas la legadon malfacila. Krome, kaj eĉ pli grave, abundas eraroj pri faktoj dum aliaj informoj ne ĉiam estas fidindaj. Aperis ankaŭ specialigitaj historiverkoj: pri la jugoslavia Esperanto-Movado (Gjivoje, 1965); pri la bulgara 1885—1890 (C. Murgin, 1964); pri SAT (1953); pri UEA (Jakob, 1933); pri KELI

(de Hoog, 1964); pri IFEF (Wajsblum, 1968); pri la japana movado (Miyamoto masao, 1969).

3.2.9.4 *Esperantologio kaj Interlingvistiko.* — La studo de la lingvo Esperanto kaj la studo de la sociaj, lingvistikaj, psikologiaj kaj ekonomiaj aspektoj de la problemo de lingvo internacia ne estas facile apartigeblaj, ĉar inter ili ekzistas esenca interrilato. Multaj verkoj kaj broŝuroj pri tiuj problemoj aperis. En 1928 aperis la verko de la bulgara lingvisto I. D. Ŝiŝmanov *Ĉu estas Ebla kaj Necesa Internacia Helplingvo?* (tr. A. D. Atanasov). *Teorio de Esperanto,* de la Ruso Varankin, aperis en 1929. Sekvis pluraj verkoj de la konata soveta lingvisto kaj esperantologo Ernest Drezen: *Elementoj de Lingvoscienco, Historio kaj Teorio de Lingvo Internacia* (ruslingva), 1929; *La Vojoj de Formiĝo kaj Disvastiĝo de la Lingvo Internacia,* 1929; *Analiza Historio de Esperanto-Movado,* 1931; *Skizoj pri Teorio de Esperanto,* 1931; *Historio de la Mondolingvo,* 1931 (represita en 1967), tradukita el la rusa de Hohlov kaj Nekrasov. De L. Ĵirkov aperis la konciza *Kial Venkis Esperanto?,* 1931. La *Enciklopedio de Esperanto* (de kiu oni nuntempe preparas novan eldonon), redaktita de L. Kökény kaj V. Bleier laŭ preparlaboroj de Ŝirjaev, aperis duvolume en 1933-35: ĝi estas mejloŝtono sur la vojo de la ekkono de la Esperanta kulturo dank' al la ampleksaj lingvaj, biografiaj, historiaj kaj interlingvistikaj kontribuaĵoj. En 1936 aperis *Esperantologia Raporto* de Kawasaki naokazu, kaj la prelegaro de la lingvisto Collinder *La Problemo de Lingvo Internacia* aperis en 1937. En 1946 aperis la verko de St. Ĝuĝev *Lingvo kaj Socio,* dum en 1950 W. J. A. Manders publikigis sian elstaran, problemstarigan *Interlingvistiko kaj Esperantologio.* La diskutebla, sed pensinstiga verko de P. Stojan *Deveno kaj Vivo de la Lingvo Esperanto* aperis en 1953 (sed estis jam de proks. 20 jaroj preta). La postan jaron aperis la unua eldono de *La Internacia Lingvo — Faktoj pri Esperanto,* redaktita de Prof. I. Lapenna kaj eldonita de CED. En 1959 la verko de G. Waringhien *Lingvo kaj Vivo* plurĉapitre pritraktas interlingvistikajn kaj esperantologiajn problemojn, kaj en 1962 la libro de W. Gilbert *Planlingvaj Problemoj* liveras interesan, kvankam ne ĉiam originalan, kontribuon al la problemo de naturalismo-skematismo. En la Unua Parto (Lingvo) de *Retoriko* (tri eldonoj: 1950, 1958, 1971) kaj en *Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj* (1966) Prof. I. Lapenna vaste pritraktas la interlingvan problemon ĉefe el historia kaj socipolitika vidpunktoj. Tre gravaj estas la dokumentoj de CED, precipe en la Serio A/II (La Problemo de Komuna Lingvo), inter kiuj elstaras la studoj de I. Lapenna, *La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj* (A/II/1 en 1962 kaj A/II/5 en 1972) kaj *Kelkaj Aspektoj de la Lingva Problemo en Internacia*

Publika Juro kaj Kompara Juro (A/II/2 en 1963), kaj la studo de Drs. G. F. Makkink *La Problemo de Komunikado en la Mondo* (A/II/3 en 1970). Unike grandan valoron havas la revuo *La Monda Lingvo-Problemo* (LMLP), regule publikigata tri fojojn jare (ekde 1969) de la mondfama eldonejo Mouton & Co. (Hago-Parizo) sub aŭspicio de CED. Tiu ĉi internacia, interdisciplina revuo pristudas la lingvan problemon en ĉiuj ĝiaj aspektoj, precipe socia, lingvistika, jura, psikologia, ekonomika. En la Redakta Komitato troviĝas 12 konataj specialistoj pri diversaj sciencaj branĉoj, kaj D-ro V. Sadler funkcias kiel ĉefredaktoro. La studoj kaj artikoloj estas publikigataj en diversaj naciaj lingvoj kun ampleksaj resumoj en Esperanto. Ĝis nun aperis kvar kompletaj volumoj (1969—1972) kaj unu kajero de Vol. 5. Aliaj sekvos. En 1971 aperis *La Problemo de Lingva Komunikado en la Nuntempa Mondo,* 46-paĝa represaĵo el LMLP, redaktita de I. Lapenna kaj V. Sadler, kun kontribuoj en la angla, franca, germana, kaj ampleksaj resumoj en la Internacia Lingvo.

Soci-lingvistikan temon parte pritraktas ankaŭ la prelegaro *Bona Ŝanco,* de D-ro Werner Bormann, kiun oni publikigis en 1970.

3.2.9.5 *Lingvaj Problemoj.* — Lingvaj verkoj pri Esperanto kaj en Esperanto estas multaj. La unua estis la *Vortaro de Esperanto* de K. Bein (kun difinoj en Esperanto), aperinta en 1910 (3-a eld. 1922). Sur la vortara kampo aparte grava estis *Plena Vortaro* (ĉefredaktoro E. Grosjean-Maupin), 1930 (7-a eld. 1964), kies *Suplemento,* pretigita de G. Waringhien, aperis en 1954. En 1970 aperis ĉefverko: *Plena Ilustrita Vortaro* de G. Waringhien, kun pli ol 1.200 paĝoj. La unua gramatiko por perfektiĝemuloj tute en Esperanto estis la verko de P. Fruictier kaj S. Kornfeld *Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado de Esperanto,* 1930. Sekvis *Internacia Gramatiko de Esperanto,* de L. Kitzler, 1934; sed la plej fama fariĝis *Plena Gramatiko* de K. Kalocsay kaj G. Waringhien (1-a eld. 1935, 2-a eld. 1938, 3-a eld. 1958-64). Cetere troviĝas verkoj ankaŭ pri aliaj demandoj. En 1931 aperis la verketo de E. Privat *Esprimo de Sentoj en Esperanto* (3-a eld. 1957), kiu pritraktas stilistikon. Pri poezia faklingvo kaj pri vortoteorio verkis K. Kalocsay en *Lingvo-Stilo-Formo* (1931, represita en 1963 kaj en 1970). Pri arto poetika, metriko, poezia fakvortaro kaj rimaro temas la libro *Parnasa Gvidlibro* de Kalocsay kaj Waringhien (1-a eld. 1932, 2-a eld. reviziita 1968, kun kontribuaĵo de R. Bernard). Artikoloj pri lingvaj problemoj troviĝas ankaŭ en la *Enciklopedio de Esperanto* (1933-35). Postmilite aperis du kromaj elstaraj verkoj: *Lingvo kaj Vivo,* de G. Waringhien, 1959, rilatas al multaj demandoj de leksikologio,

filologio, lingvistiko, interlingvistiko, gramatiko, ktp.; kaj la tre valora *Gvidlibro por Supera Ekzameno*, redaktita de A. Pechan, kies unua volumo pritraktas gramatikajn kaj lingvajn problemojn, dum la dua prezentas ĉapitrojn pri gramatiko, historio, literaturo, organizo de Esperanto. La du volumoj aperis resp. en 1964 kaj en 1966.

Resume, jen kelkaj nomoj de aŭtoroj de verkoj aŭ studoj:

Pri metriko skribis Parisot (1909), Kalocsay (1931), Waringhien (1932), De Kock (1961, 1967), B. Clark (1957);

Rimvortarojn verkis Rhodes (1905), Parisot kaj Cart (1909), Avoto (1918), M. Jaumotte (1931), Waringhien (1932), R. Bernard (1968);

Pri gramatikaj problemoj: Mair, Lippmann, Fauvart-Bastoul, Waringhien, Kalocsay, De Hoog, Lapenna, Setälä, L. Mimó, T. Jung, Seppik, R. Schwartz, E. Vilborg, Ossaka, Støp-Bowitz, de Saussure, Nakamura, Faulhaber, k.a.;

Pri sintakso: Lambert, Devjatnin, Fruictier, Török, Quarello;

Pri leksikologio kaj etimologio: Boirac, Sentis, Panel, Wüster, Waringhien, Neergaard, Modrijan, D. B. Gregor, Cart, Kawasaki, Setälä, k.a.;

Pri vortoteorio: Ĉefeĉ (ps. de Höveler), R. de Saussure, Couturat, Fruictier, Kalocsay, G. Kolowrat, Panel, Aymonier, Isbrücker, Wüster, k.a.;

Pri fonetiko: Javal, Höveler, Moch, Krysta, Collinson, Okamoto, Nylén, Stojan, Wells k.a.;

Pri stilistiko: Kalocsay, Privat, Auld, Faulhaber, Nakamura, k.a.;

Pri retoriko: I. Lapenna;

Pri ĝeneralaj problemoj: W. J. A. Manders, G. J. Degenkamp, P. Stojan, E. Wüster;

Pri bibliografio: Stojan, Neergaard, Steiner, Tonkin, Haupenthal.

3.3 DE SKRIBA AL PAROLATA LINGVO

3.3.1 Signifo de la Parola Kulturo

Lingvo plene socie enradikiĝas nur se ĝi utilas kiel rimedo de komunikado sur ĉiuj kampoj, inkluzive la parolan uzon. Necesas ankaŭ konsideri la fakton, ke la interhoma parola komunikado estas la situacio, en kiu la lingvo iĝas vere „vivanta": en senpera, spontana uzo, la lingvo malrigidiĝas, liberiĝas kaj fariĝas pli fleksebla. Tiel kreiĝas novaj vortoj kaj novaj signifoj, kaj la lingvo ricevas ekpuŝon al enhava kaj forma evoluo („semiologia vivo" laŭ Ferdinand de Saussure).

3.3.2 Faktoroj

Ekzistas pluraj faktoroj, diversgrade influaj, kiuj faciligis la transformiĝon de Esperanto en parolatan lingvon, kaj kiuj nuntempe plu kontribuas al ĝia vivanteco. Nur kelkaj el ili estos ĉi tie koncize menciitaj el sistema vidpunkto [6].

3.3.2.1 *Denaskaj Esperantistoj.* — Sendube, plej interesa estas la ekzisto de denaskaj esperantistoj. L. L. Zamenhof skribis, ke „lingvo internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia kazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiuj akceptas ĝin kiel sian lingvon familian, heredan". Ekzistas familioj, kiuj, pro malsamlingveco de la geedzoj, aŭ pro konscia akcepto de la lingvo, fariĝis dulingvaj: ili uzas, unuflanke, la nacian lingvon, kaj, aliflanke, Esperanton. Estas konata fakto, ke dulingvismo ne damaĝas la infanan psikon; kontraŭe, ĝi faciligas la lernejan studon, ĉar ĝi jam frutempe permesas spontanan komparon de diversaj lingvosistemoj (t.e. de diversaj pensokategorioj), kio estas tre utila por la evoluigo de kritika menso.

Plej verŝajne, la unuaj „denaskaj esperantistoj" estis la gefiloj de M. C. Butler (1884-1970). Hodiaŭ ekzistas minimume 200 infanoj aŭ junuloj en pli ol 19 landoj, kies hejma lingvo estas Esperanto. Por la gepatroj aperas *Gepatra Bulteno.*

3.3.2.2 *Instruado al Infanoj en la Lernejoj.* — Unu el la faktoroj, kiuj influas la parolatan lingvon, estas ĝia instruado en la lernejoj. Estas konate, ke Esperanto estas taŭga bazo ankaŭ por la lernado de aliaj lingvoj. Krome, ĝi helpas la studadon de geografio, historio kaj parencaj sciencaj branĉoj. Tio, siavice, povas efike kontribui al la maturiĝo de la junaj gelernantoj, al akiro de internacieca pensmaniero.

Grava ŝtupo en la lerneja laboro estas la interlerneja korespondado. La unua tiaspeca esperantlingva korespondado okazis en 1903 inter la instruisto Čejka en Bystřice-Hostýn, Moravio, kaj la instruisto Ducommun en Le Locle, Svislando. Inter la du militoj, la instruistaj Esperanto-asocioj funkciis kiel organizaj centroj de interlerneja korespondado. Nuntempe eminentas la tutmonde organizita rondo *Grajnoj en Vento,* kun centro en Bienne, Svislando. Gravan helpon donas la Koresponda Servo de UEA.

Esperanto kaj Instruistoj, de J. Aizière (tr. P. Georgievskij), 1914, apartenas al la unuaj pritraktoj de instruado de Esperanto.

6. Detaloj pri la unuopaj faktoroj, precipe pri lernejoj, kongresoj, infankongresetoj, skoltoj, turismo, sonbendoj, oratoraj konkursoj, teatro, sonfilmoj, diskoj, radio kaj kantaroj troviĝas en aliaj ĉapitroj de tiu ĉi verko.

Interesa estas ankaŭ la verko de E. Izgur, *La Mondlingvo Esperanto kaj Lernejo* (1926), kaj tre valora estas la studo de P. Bovet, eksdirektoro de la Pedagogia Instituto J. J. Rousseau, en Ĝenevo, *Enketo pri Internacia Helplingvo* (1948). Plej aktualaj estas la verkoj de Peter Zlatnar, *Esperanto kaj Lernejo* (1959), la studo de R. Markarian, *La Eduka Valoro de la instruado de Esperanto en la Lernejoj* (CED-Dok. B/I/2, 1964 kaj 1970), kiel ankaŭ pluraj dokumentoj de CED en la Serio B/IV. Plej lastdata estas la libro de Prof. Rudolf Rakuša, *Metodiko de la Esperanto-Instruado* (1970), kies unua eldono aperis en 1957.

3.3.2.3 *Porinfana Literaturo.* — Por denaskaj esperantistoj kaj por la plej junaj gelernantoj aktivas porinfana libro-eldonado. Temas precipe pri tradukaĵoj. El 36 porinfanaj libroj, aperintaj inter 1961 kaj 1969, nur 5 estis verkitaj originale en Esperanto. Jam inter la du militoj aperis multspecaj verkoj por infanoj, sed nur post la Dua Mondmilito aperis ankaŭ hodiaŭ aprezataj verkoj, inter kiuj: V. Setälä, *Peĉjo kaj Anjo Kalkulas*, 1951; J. F. Berger, *Niko kaj Nina*, 1952; *El Japanaj Lando kaj Popolo*, 1953; Fran Levstik, *Martin Krpan* (tr. Kozlevčar), 1955; dramigo de bela infanrakonto de Miyazawa kenzi, *Gauche la 'Ĉelisto* (tr. Nozima yasutarô), 1955; Šimomura jošiši, *Japanaj Fabeloj*, 1958; la popolrakonto *Mojca Etulino* (tr. Drago Kralj), 1960; *Bela Konvolvulo* (el Ĉinio), 1964; M. Slösser-Bresler, *Kion Erna Travivis en Pinurbo*, 1962; Valda Vinař, *Ĉeňaj Fabeloj, 1962;* P. A. G. Wright, *La du Pupoj*, 1963; Irena Jabłonska, *La Ebria Muso* (orig. fabeloj), 1965; J. Fekete, *Vuk* (pribesta romano), 1966; Béla Balász, *La Sep Reĝidoj*, 1970; H. Hoffmann (tr. Applebaum), *Struvelpetro*, 1971 (jam aperinta en 1921), k.a.

Por pli aĝaj infanoj aperis ankaŭ la tri verkoj de J. H. Sullivan *La Junaj Detektivoj* (2-a eld. 1968), *La Junaj Trezor-serĉantoj*, 1968, *La Longa Marŝo*, 1968.

Interesa estas ankaŭ la porinfana verkisto, kiu sin kaŝas sub la pseŭdonimo Nenjo Rimanto; el liaj verkoj estas menciindaj: *ABC-Rimoj por Etuloj*, 1953; *El Kornvalo*, 1958; *Juveloj*, 1965; *Versoj por Infanoj*, 1966.

Kelkaj eldonejoj publikigis tutajn seriojn da infanlibroj, precipe la ĉinaj kaj japanaj eldonejoj, Esperantaj Francaj Eldonoj kaj Esperanto Press (Kanado).

3.3.2.4 *Infanaj Kongresetoj.* — Grandan pedagogian valoron havas la infanaj kongresetoj, kiuj ekde antaŭ kelkaj jaroj okazas paralele kun la Universalaj Kongresoj de Esperanto. Ili celas helpi la gepatrojn kaj, aliflanke, taŭge enkonduki la infanojn en internacian

kaj internacilingvan etoson per aktivigaj, kree instigaj novaj pedagogiaj metodoj.

3.3.2.5 *Skolta Movado.* — Estas menciinda ankaŭ la agado en skoltaj medioj. Malgraŭ la favora opinio de Baden-Powell, dum multaj jaroj Esperanto ne estis konsiderata en la plej altaj internaciaj skoltaj instancoj. Sed, dank' al la bona agado de Skolta Esperantista Ligo pere de broŝuroj, lernolibroj, kursoj, dokumentoj de CED, invitoj al la praktika apliko de Esperanto, ekde 1968 la situacio rimarkinde pliboniĝis kaj kondukis al nuligo de la antaŭa negativa starpunkto. Eble tio kaŭzos eĉ la aplikon de Esperanto en la skolta mondo, en oficiala formo. Tio multe dependas de la plua efika agado en skoltaj medioj.

3.3.2.6 *Kongresoj kaj Kunvenoj.* — Unuarangan signifon por la praktikado de la parolata lingvo havas la kongresoj, konferencoj, seminarioj, kunvenoj de regionaj societoj kaj lokaj grupoj. Tiuj kaj similaj renkontiĝoj prezentiĝas kiel mikrosocio, kie la lingva kaj kultura „normoj" kreiĝas dank' al mekanismo de lingva/kultura propono kaj akcepto. Ĝuste en tiuj „mikrosocioj" kun aparta, propra strukturo, la tradicio de la parola kulturo plej efike kaj plej multflanke manifestiĝas.

3.3.2.7 *Turismo kaj Feriejoj.* — En la tuta mondo multiĝas feriejoj kun kulturaj aŭ pure turismaj celoj, hoteloj kaj kampadejoj, en kiuj Esperanto estas uzata. La moderna multnacia amasa turismo ebligus vastan interŝanĝon de kulturaj valoroj, se la lingva problemo estus solvita je pli larĝa skalo. Tamen, jam hodiaŭ, la meznivela turisto, kiu parolas Esperanton, scias pli multe, kaj ricevas pli grandan kulturan gajnon, ol alia persono, kiu nur balbutas fremdlingve, aŭ esprimas sin per gestoj.

3.3.2.8 *Magnetofona Korespondado, Sonbendaj Programoj.* — Ekde 1957 aktivas la Magnetofona Servo de UEA. Nuntempe ĝi havas ĉ. 300 surbendigitajn programojn. Ili estas interesaj por ĉiuj, ĉefe por personoj, kiuj deziras praktiki la parolan lingvon, sed troviĝas ekster la centroj, en kiuj la lingvo estas regule parolata. Rimarkinda estas la signifo de tiu normlingva edukado pere de surbendigitaj, ĝenerale modelaj voĉoj. Daŭre intensiĝas ankaŭ la korespondado per magnetofonaj bendoj.

3.3.2.9 *La Oratorado.* — La oratorado ĉiam estis kaj restas alte respektata en ĉiuj lingvaj komunaĵoj. Zamenhof mem iniciatis ankaŭ tiun artobranĉon per siaj paroladoj. En la parolado eldirita dum la inaŭguro de la Prepara Konferenco de Ruslandaj Esperantistoj en

Peterburgo (1910) li atentigis pri la rolo de la Esperanta parolarto por la firmigo kaj disvastigo de la lingvo. Tamen, por la formiĝo kaj plua evoluigo de la Esperanta parolarto en la vera senco de la vorto, la plej grandajn meritojn havas la forpasinta Edmond Privat kaj, nuntempe, Ivo Lapenna. Ambaŭ famiĝis pro siaj paroladoj kaj prelegoj, rimarkinde altnivelaj el enhava kaj forma vidpunktoj, ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en aliaj lingvoj. Ankaŭ pluraj aliaj fariĝis internacie konataj.

La paroladoj de Zamenhof aperis en *Originala Verkaro* (red. J. Dietterle, 1929) kaj aliloke; tiuj de Privat en diversaj periodaĵoj kaj unu en *Retoriko;* parto de la paroladoj de Lapenna aperis en la libro *Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj* (1966), en diversaj periodaĵoj, multaj el ili ankaŭ en nacilingvaj tradukoj.

Post la Dua Mondmilito, fortan impulson al la evoluigo de la Esperanta parolarto donis la Oratoraj Konkursoj por gejunuloj, kiuj regule okazas dum la Universalaj Kongresoj; la oratoraj konkursoj dum la Kongresoj de TEJO, kiel ankaŭ la konkursoj okaze de aliaj internaciaj renkontiĝoj.

Apartan signifon por la evoluigo de la parolarto en la Internacia Lingvo havis kaj plu havas la verko *Retoriko* de I. Lapenna, unue publikigita en 1950 (tria eldono en 1971), kiu en la ampleksa Dua Parto pritraktas la teorion de tiu ĉi arta branĉo, kun aparta konsidero al esperantlingva parolarto.

3.3.2.10 *Teatro.* — Ĉiu lingva komunaĵo klopodas krei propran teatran trupon. Ne hazarde, ĉar la teatro fakte altiras kaj flegas intereson por tiu lingvo, donas al ĝi prestiĝon, influas favore la lingvouzon, permesante tiel la pludaŭron de malnovaj lingvaj esprimoj, aŭ la alprenon de novaj. Resume: ĝi permesas pli efike establi — kaj kontroli — la lingvan normon. Kreskanta nombro da teatraj trupoj, ofte kun partopreno de profesiaj aktoroj, kaj diversaj amatoraj grupoj plenumas tiun pozitivan rolon en la Internacia Lingvo kaj, krome, efike kontribuas al ĝia vivanteco.

3.3.2.11 *Sonfilmoj.* — Esperanta sonfilmo (de Paramount) estis projekciita dum la Universala Kongreso en Oxford (1930). En 1934 oni planis fondon de kooperativo por financado de Esperantaj sonfilmoj, sed la tiamaj politikaj cirkonstancoj malebligis la efektivigon de la ideo. Nuntempe aperas ĉiujare 2-3 novaj filmoj, ĉefe kun komerca, turisma, propaganda aŭ kultura karaktero.

3.3.2.12 *Diskoj.* — Diskoj en Esperanto, ĉiam pli multaj, prezentas interesan kolekton de popolaj, klasikaj kaj modernaj kanzonoj, modkantoj, paroladoj, literatura recitado. Ilin aperigas UEA, diversaj

firmoj en orienteŭropaj landoj, en Skandinavio, en Japanio, en Latina Ameriko kaj en Ĉinio. Ekzistas ankaŭ pluraj surdiskaj Esperanto-kursoj kaj multaj diskoj por lerni korektan prononcon. La muzikisto Jo Haazen, la Duo Espera kaj la kantistino Ramona van Dalsem, kiu ĝenerale mem verkas siajn kanzonojn, eldonis lastatempe proprajn diskojn.

3.3.2.13 *Radio.* — Al la parola kulturo multe kontribuas la radio-disaŭdigoj en la Internacia Lingvo. La unuaj okazis tuj post la Unua Mondmilito. Temas ĝenerale pri kompletaj Esperantlingvaj elsendoj, sed ekde antaŭ kelkaj jaroj la Pola Radio enkondukis ankaŭ novan, interesan sendmanieron, nome la t.n. „Esperantajn Minutojn" dum pluraj nacilingvaj programoj por la eksterlando.

3.3.2.14 *Kantaroj.* — La kanto estas grava faktoro en la parola kulturo. Ĝi kunligas homojn kaj tiel devigas ilin observi lingvan disciplinon kaj konformecon. Ĝis 1911 aperis ĉ. 300 muzikaj eldonaĵoj. Nun ili estas tiel multnombraj, ke superrigardo ne eblas.

Inter la muzikaj eldonaĵoj elstaras la kantaroj. Verŝajne la unua internacia kantaro, publikigita antaŭ la Unua Mondmilito, estis tiu de W. Fries (2-a eld. en 1913). La *Internacia Kantaro* de Bennemann (kolekto el 26 nacioj) estis publikigita en 1922 (2-a eld. en 1930). La *Kantaro Esperanta* de M. C. Butler aperis en 1926, ktp.

Menciindaj estas ankaŭ la „specialigitaj" kantaroj, ekzemple la socialista kantaro en 1932 kaj multnombraj religiaj kantaroj (protestantaj, katolikaj, k.a.).

Dise tra la mondo, precipe en la pli fortaj Esperanto-societoj, aktivas kantĥoroj, kiuj siavice kontribuas al la flegado de la parolata lingvo.

En tiu ĉi kunteksto estu menciitaj la nomoj de kelkaj komponistoj, kiuj muzikigis originalajn esperantlingvajn poemojn: unue Adelsköld kaj Félicien Menu-de-Ménil, poste Sárossi (ĉefe poemojn de Baghy kaj Kalocsay), kaj Ŝt. Urban (ĉefe poemojn de Baghy, Kalocsay kaj Auld).

3.3.2.15 *I.S.U. kaj Fakaj Kunvenoj.* — Por la evoluigo de Esperanto kiel parola kaj diskuta lingvo en diversaj sciencaj branĉoj kaj fakoj, unuarangan valoron havas Internacia Somera Universitato, kiu ekde 1950 funkcias seninterrompe kiel aparta institucio de UEA, kaj la internaciaj kunvenoj aŭ kongresoj de fakaj Esperanto-Organizaĵoj. En la nuna ISU entute okazis ducento da prelegoj, rilatantaj al diversaj sciencaj branĉoj: juro, medicino, biologio, matematiko, lingvistiko, ekonomiko, sociologio, literaturo, ktp. Post la prelegoj oni nun povas fari demandojn al la preleginto aŭ diskuti unuopajn punk-

tojn. Aliflanke, pluraj fakaj asocioj organizas, dum internaciaj renkontiĝoj, prelegojn kun diskutoj pri apartaj temoj en la kadroj de la respektivaj fakoj. Tiurilate elstaras la laboro de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio kaj de la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. La lasta regule organizas publikajn kunvenojn, en kiuj oni pritraktas difinitajn demandojn, precipe sur la kampo de kompara juro, kutime en kunlaboro kun lokaj juristaj fakaj organizaĵoj. Sekvante la ekzemplon de UEA, ankaŭ aliaj organizaĵoj kaj instancoj ekagis en simila maniero, organizante fakajn aŭ popularsciencajn aranĝojn. Menciindaj, tiurilate, estas Somera Esperanta Universitato en Gyula (Hungario), kiu en 1972 celebris la 10-jaran jubileon de sia funkciado; Sveda Somera Semajno, organizata de Sveda Esperanto-Instituto; la Seminarioj de GEJ kaj tiuj de TEJO.

3.4 ESENCA BIBLIOGRAFIO

Arcaini, Enrico, *Dalla linguistica alla glottodidattica.* Torino 1968.

Auld, William, *Esperanto as a literary language* (CED-Dok. D/I/3). Londono 1962 kaj 1964.

——, *Mitoj kaj faktoj pri Esperanto* (CED-Dok A/IV/7). Londono 1964.

Drezen, E., *Historio de la mondolingvo. Tri jarcentoj da serĉado.* 3-a eld. Oosaka 1967.

Falkenhahn, Viktor, „Lingvosciencaj konsideroj pri la rolo kaj strukturo de Esperanto". *Der Esperantist*, vol. 4, 1968, n-ro 18/19, p. 3-11, 17-28.

Gregor, D. B., *La kultura valoro de Esperanto* (CED-Dok. A/IV/8). Londono 1967.

Lapenna, Ivo, *Retoriko.* 3-a eld. Rotterdam 1971.

Martinet, André, *Grundzüge der allgemeinen Sprachwissenschaft.* Stuttgart 1963.

Saussure, Ferdinand de, *Cours de linguistique générale.* Lausanne-Paris 1916.

Jarlibro de UEA, 1960-72.

La Monda Lingvo-Problemo, vol. 1-3, 1969-72.

ĈAPITRO 4

INSTRUADO DE ESPERANTO

4.1 ENKONDUKO

Por rapida disvastigo de la Internacia Lingvo grava problemo estis tiu de ĝia instruado, resp. lernado. En sia fama letero al N. Borovko (1895), Zamenhof skribis:

> Dum longa tempo restis nesolvita unu problemo, kiu havas grandegan signifon por neŭtrala lingvo. Mi sciis, ke ĉiu diros al mi: 'Via lingvo estos por mi utila nur tiam, kiam la tuta mondo ĝin akceptos; tial mi ne povas ĝin akcepti ĝis tiam, kiam ĝin akceptos la tuta mondo'. Sed ĉar la 'mondo' ne estas ebla sen antaŭaj apartaj 'unuoj', la neŭtrala lingvo ne povis havi estontecon ĝis tiam, kiam ĝia utileco fariĝos por ĉiu aparta persono sendependa de tio, ĉu la lingvo jam estas akceptita de la mondo aŭ ne. Pri tiu ĉi problemo mi longe pensadis.

Fine, Zamenhof venis al la penso aranĝi la lingvon en la maniero de „ŝlosilo", kiu, „enhavante en si ne sole la tutan vortaron, sed ankaŭ la tutan gramatikon en la formo de apartaj, tute memstaraj kaj alfabete ordigitaj elementoj, donus la eblon al... adresato de kia ajn nacio tuj kompreni vian leteron".

La esence aglutina karaktero de Esperanto ebligis al Zamenhof realigi ankaŭ tiun ideon.

En julio 1887 aperis en Varsovio la rusa eldono de la *Unua Libro*. Ĝia titolo estis en la rusa. La Esperanta traduko tekstas: D-ro Esperanto, *Internacia Lingvo, Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro*. Sur la titolpaĝo estis presite en Esperanto „por Rusoj" kaj en la rusa lingvo: „Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia".

Tiuj kelkaj vortoj reflektas la kvintesencon mem de la tuta demando de komuna internacia lingvo. Sur la dua paĝo troviĝas la permeso de la cenzuro kun la dato „la 21-a de majo 1887", kaj jena teksto en la rusa lingvo: „La lingvo internacia, kiel ĉiu nacia, estas socia proprajo; la aŭtoro forlasas por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn al ĝi". Tiun duan, same gravan, starpunkton kompletigas noto en la rusa sur la tria paĝo de la kovrilo: „La rajto de traduko de tiu ĉi broŝuro en ĉiujn lingvojn apartenas al ĉiu". Fine, sur la lasta paĝo troviĝas la adreso de la aŭtoro: Al S-ro D-ro L. Zamenhof por D-ro Esperanto en Varsovio ...

La enhavo de la *Unua Libro* konsistas el Antaŭparolo (28 p.) kun la unuaj tekstoj en Esperanto; kartetoj kun la teksto de la konata promeso ellerni la lingvon, se dek milionoj da personoj donos publike la saman promeson; plena lernolibro de la lingvo, nome alfabeto kaj 16 gramatikaj kaj sintaksaj reguloj; sur aparta folio troviĝas Esperanto-Rusa Vortaro kun klarigoj pri uzo.

Inter julio kaj la fino de 1887 aperis la pola, franca kaj germana eldonoj. En decembro 1887 estis publikigita la dua rusa eldono. „La ruslingva *Unua Libro* entenas kelkajn formojn, kiuj malaperis en la franca, pola, ktp." (P. E. Stojan). La unua angla eldono (trad. J. Steinhaus) aperis en 1888, sed „ĝi montriĝis ne sufiĉe bona kaj unu jaron poste, publikiginte la tradukon de Geoghegan, Zamenhof detruis la unuan" (A. Albault). La *Unua Libro*, tiu 40-paĝa broŝureto, larĝigita per la *Universala Vortaro* kaj la *Ekzercaro* fariĝis la *Fundamento de Esperanto:* la nekontestebla bazo de ĉio kreita en la Internacia Lingvo kaj pere de ĝi. Kompreneble, ĝi plu restas ankaŭ la fundamenta lernolibro [1].

Ĉiuj personoj, kiuj ellernis la lingvon en tiu plej frua periodo, utiligis por tiu celo la diverslingvajn eldonojn de la *Unua Libro*. La adresaro de 1889 jam enhavis mil nomojn de personoj, kiuj ellernis Esperanton. Inter ili troviĝis De Beaufront, Dombrovski, Einstein, Frollo, Geoghegan, Grabowski, Kofman, Marignoni, Solovjev, Trompeter, De Wahl kaj aliaj konataj nomoj.

La diversaj personoj, kiuj ricevis tiujn unuajn lernolibrojn, povis relative facile ne nur ellerni la lingvon, sed ankaŭ kompreni tekston skribitan en tiu lingvo, eĉ antaŭ ol ellerni ĝin. Similan rolon ludis poste la malgrandaj, t.n. „ŝlosiloj", kiuj ankaŭ hodiaŭ neniel perdis sian signifon.

1. La 9-a eldono de *Fundamento de Esperanto,* kun bonegaj enkondukoj, notoj kaj lingvaj rimarkoj de D-ro A. Albault, Membro de la Akademio de Esperanto, aperis en 1963, publikigita de Esperantaj Francaj Eldonoj.

4.2 ŜLOSILOJ

Temas pri malgrandaj libretoj, kiuj enhavas la bazajn regulojn de la gramatiko kaj radikaron sufiĉan por la ĉiutagaj bezonoj. En la ŝlosiloj troviĝas ankaŭ la plej necesaj informoj pri la Internacia Lingvo kaj pri organizo de la Esperanto-Movado, inkluzive la landan organizaĵon, se tia ekzistas. Krome, kutime troviĝas informoj pri la eblecoj plu studi la lingvon. La lasta eldono de la angla ŝlosilo enhavas ankaŭ la konatan Rezolucion de Unesko de 1954, en la angla lingvo.

Kleraj personoj, kiuj serioze trastudis la ŝlosilon, povas sen grandaj malfacilaĵoj legi tekstojn en Esperanto. Al la ideo eldoni tiaspecajn ŝlosilojn venis la germana esperantisto Herbert F. Höveler (E. Ĉefeĉ). La unua, en la angla lingvo, aperis en 1905, verkita en kunlaboro kun E. A. Millidge. Jam en 1912 ekzistis ŝlosiloj en 18 lingvoj. Ekde 1925 la aperigon de la ŝlosiloj prizorgis ICK, poste UEA. Laŭ la normo de ICK ĝis 1933 aperis ŝlosiloj en 26 lingvoj.

Post tio aperis ŝlosiloj ankaŭ por aliaj lingvoj, dum en pluraj kazoj estis publikigitaj eldonoj de ŝlosiloj, aperintaj jam pli frue en la samaj lingvoj. Ĝis la mezo de 1972 tiaj ŝlosiloj entute aperis en la lingvoj afrikansa, albana, angla, araba, baska, bulgara, ĉeĥa, dana, estona, finna, flandra, franca, germana, hispana, hungara, islanda, itala, japana, jida, kataluna, kimra, kroata, latva, litova, malaja, nederlanda, norvega, persa, pola, portugala, romanĉa, rumana, rusa, serba, sinhala, slovaka, slovena, sveda, ukrajna, do entute por 39 lingvoj. UEA planas reeldonon de ŝlosiloj ne plu havigeblaj, kaj eldonon de aliaj, precipe por lingvoj de landoj, en kiuj la Esperanto-Movado estas ankoraŭ malforta.

Kelkaj eldonoj de la ŝlosilo estis faritaj en tre multaj ekzempleroj. Ekzemple, la sveda ŝlosilo estis eldonita en 215.000 ekzempleroj ĝis la jaro 1953.

4.3 LERNOLIBROJ KAJ INSTRUAJ HELPILOJ

La ŝlosiloj, kompreneble, estis kaj plu estas tre utilaj, sed ili ne povas kontentigi la bezonojn de serioza studado de Esperanto. Tiucele oni nuntempe uzas bonajn gramatikojn, vortarojn, lernolibrojn, diskojn, sonbendojn, legolibrojn kaj similajn instruajn helpilojn. Tiu tuta abunda materialo estas dividebla je: nacilingvaj lernolibroj; internaciaj gramatikoj kaj aliaj internaciaj lernolibroj; libroj por superaj kursoj kaj instruistoj de Esperanto; helpaj instruaj rimedoj.

4.3.1 Nacilingvaj Lernolibroj

Lernolibroj de Esperanto por diversaj lingvoj unue aperis en la jaro 1887. De tiam ĝis hodiaŭ senĉese novaj, ĉiam pli bonaj lernolibroj estis kaj estas publikigataj. Kompreneble, ne ĉiuj lernolibroj estis sur la sama nivelo, kaj ankaŭ nuntempe ne ĉiuj havas la necesajn pedagogiajn kvalitojn, sed, ĝenerale, ilia kvalito daŭre altiĝas.

Jen la lingvoj, en kiuj unue estis publikigitaj lernolibroj aŭ vortaroj por studado de Esperanto kun, parenteze, la jaro de la unua eldono:

Afrikansa (1934), albana (1928), angla (1888, resp. 1889, ĉar tiu de 1888 estis detruita), araba (1907), armena (1909), astura (1917), baska (1936), bretona (1930), bulgara (1889), ĉeĥa (1890), ĉina (1912), dana (1890), estona (1893), finna (1902), franca (1887), friula (1922), germana (1887), greka (1907), hebrea (1888), hispana (1889), hungara (1898), islanda (1909), itala (1889), japana (1906), judgermana (1888), judhispana (1912), kartvela (1910), kataluna (1906), kimra (1910), korea (1921), kroata (1909), latina (1916), latva (1889), litova (1890), malaja (1921), mongola (1964), nederlanda (1900), norvega (1907), persa (1915), pola (1887), portugala (1892), romanĉa (1922), rumana (1889), rusa (1887), serba (1908), sinhala (1963), slovaka (1907), slovena (1910), sveda (1889), tagala (1908), taja (1938), tatara (1913), turka (1909), ukrajna (1907), visaja (1908), vjetnama (1932); do entute 56 lingvoj.

Laŭ la statistiko, publikigita en la verko *Bibliografio de Internacia Lingvo* de P. E. Stojan, en la periodo de 1887-1928 entute aperis 1.568 verkoj en 50 naciaj lingvoj kun lerna aŭ propaganda karaktero. Tamen, ankaŭ la verkoj kun propaganda-informa enhavo ofte klarigis la bazajn trajtojn de la strukturo de Esperanto. La sekvantaj informoj, donitaj ĉefe laŭ la Bibliografio de Stojan, sed korektitaj kaj kompletigitaj laŭ la sliparo de CED, indikas la lingvojn, en kiuj estis publikigitaj la menciitaj lernaj aŭ informaj libroj en kvinjaraj interspacoj, kun la escepto de la komenca, sepjara periodo:

En la periodo *1887-1893* lernolibroj kaj informaj verkoj aperis en la rusa, pola, franca, germana, angla, hebrea, judgermana, bulgara, rumana, sveda, itala, hispana, latva, ĉeĥa, dana, litova, portugala, estona.

Inter *1894* kaj *1898* sekvis la hungara.

En la periodo *1899-1903* aperis verkoj en la nederlanda kaj finna.

Inter *1904* kaj *1908* estis publikigitaj verkoj en la japana, kataluna, araba, greka, slovaka, norvega, ukrajna, serba, tagala kaj

visaja (ambaŭ en Filipinoj) lingvoj.

Sekvas la tre fruktodonaj jaroj *1909-1913,* kiam aperis lernaj kaj informaj materialoj en la armena, islanda, kroata, turka, kartvela, kimra, slovena, ĉina, judhispana kaj tatara.

Dum la militaj jaroj, *1914-1918,* aldoniĝis la persa, latina kaj astura lingvoj.

Kvar pliaj lingvoj, la korea, malaja, friula kaj romanĉa estas notitaj en la periodo *1919-1923.*

Fine, *inter 1924* kaj *1928* aperis la unuaj materialoj en la albana.

Ekde 1929 aperis konsiderinda nombro da lernolibroj en la vera senco de la vorto por multaj el la menciitaj lingvoj, dum en pluraj aliaj kazoj la unuaj semoj ne donis pliajn fruktojn. Aliflanke, aperis lernolibroj por aliaj lingvoj, ekz. la afrikansa, baska, bretona, mongola, sinhala, taja kaj vjetnama. Verŝajne la nombro de ĉiuj publikigitaj lernolibroj estas pli ol 2.000 por sesdeko da lingvoj.

Ideon pri la lernolibroj, havigeblaj nuntempe en diversaj lingvoj, donas la listo en la Libroservo de UEA. Ĝi inkluzivas lernolibrojn, vortarojn kaj bazajn informilojn pri la strukturo de la lingvo. Jen la lingvoj en alfabeta sinsekvo: afrikansa, albana, angla, araba, bulgara, ĉeña, dana, finna, franca, germana, hebrea, hispana, hungara, indonezia, islanda, itala, japana, jida, kataluna, korea, kroata, litova, nederlanda, norvega, persa, pola, portugala, romanĉa, rusa, serba, sinhala, slovaka, slovena, sveda kaj turka, entute do en 35 lingvoj. Entute en la Libroservo troviĝas 244 diversaj nacilingvaj lernolibroj. Plej multnombraj estas en la angla lingvo (29); sekvas la franca (22); sur la tria loko estas la germana kaj nederlanda (po 20). Komprenеble, ekzistas ankaŭ multaj aliaj lernolibroj, ne troviĝantaj en la menciita listo; ne nur en la 35 listigitaj lingvoj, sed ankaŭ en aliaj.

Por helpi al la verkantoj de lernolibroj UEA formis apartan Kontrolkomisionon de Lernolibroj. Ĝia tasko estas tralegi manuskriptojn, kiujn la aŭtoroj libervole prezentas al ĝi por kontrolo kaj sugestoj pri eventualaj plibonigoj. La Komisiono aparte atentas al korekteco de la eksplikoj pri la gramatikaj reguloj kaj leksikaj difinoj. En ĝi troviĝas elstaraj konantoj de la lingvo, apartenantaj al malsamaj lingvaj familioj.

Tiu ĉi tuta abunda instrumaterialo estas utiligebla ne nur por kursoj de diversaj gradoj, sed, depende de la karaktero de la lernolibro, ankaŭ por memlernantoj. Estas menciinde, ke en la lastaj jaroj aperis pluraj lernolibroj en diversaj lingvoj, speciale verkitaj por instruado de infanoj en la lernejoj aŭ ekster ili.

4.3.2 Internaciaj Lernolibroj

Apartan grupon formas la lernolibroj verkitaj komplete aŭ grandparte en Esperanto, kaj tial utiligeblaj internacie. Tiaj lernolibroj kondukas la lernanton iom post iom de la plej simplaj gramatikaj reguloj al pli komplikaj formoj, vastigante senĉese la vortprovizon. Ekzistas jam sufiĉe multaj lernolibroj en tiu ĉi kategorio, uzataj ĉu por kursoj, ĉu en lernejoj, ĉu por memlernado.

Menciindaj estas la konata *Ĉe-kurso*, verkita de Andreo Cseh (Ĉe); la same konata *Konversacia Esperanto-Kurso* de F. Szilágyi; la moderna *Esperanto I* kaj *Esperanto II* de I. Szerdahelyi; la popularа *Esperanto laŭ Metodo Friis* de L. Friis; *Elementa Legolibro de Esperanto* de Mijake šihej kaj *Intensiva Kurso de Esperanto* de Nakamura t., ambaŭ el Japanio; la tre populara *Privilegia Vojo* de V. Setälä; la pedagogie elstaraj *Tom kaj Tina, Instrukcioj* kun metodikaj konsiloj pri la uzo de *Tom kaj Tina*, kaj *Tom kaj Tina en Flugmašino*, ĉiuj tri de Ole Nederland.

Kreskanta nombro da lernolibroj estas taŭgaj por instruado de la Internacia Lingvo al infanoj en la lernejoj aŭ ekster ili. La menciita lernolibro de Szerdahelyi estas devige uzata en la lernejoj de Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio, nome en la landoj, kiuj partoprenas en la t.n. Pedagogia-Didaktika Eksperimento. Ĝi estas ankaŭ proponita al ILEI kiel lernolibro unuece uzenda en ĉiuj lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata.


Alia tre bona lernolibro por uzo en lernejoj estas *Ni Parolu Esperanton* de R. H. Markarian. *Esperanto por Infanoj* de G. Gladstone Solomon estas taŭga por tre junaj geknaboj. Por instruado de Esperanto al infanoj estas bonege utiligeblaj ankaŭ pluraj aliaj lernolibroj, ekzemple la menciitaj *Privilegia Vojo* kaj la du lernolibroj pri *Tom kaj Tina*.

Kelkaj lernolibroj estas dediĉitaj al difinitaj medioj. Ekzemple, *Petro*, publikigita de SAT, estas kursa lernolibro por laboristoj. *Jamborea Lingvo* de J. K. Hammer estas rektmetoda kurso por skoltoj, dum *Ĉu Vi Parolas Tendare?* de R. Corsetti kaj Mauro La Torre estas speciale verkita por la partoprenantoj de internaciaj labortendaroj.


Superflue diri, ke kiu ajn bona lernolibro — ĉu nacilingva, ĉu internacia — estas taŭge uzebla ankaŭ por instruado en fakaj aŭ aliaj specialaj medioj. Por vastigi la koncernan fakan aŭ specialan vortprovizon, la instruisto aŭ la memlernanto povas facile utiligi la respektivan fakan terminaron. Ĝis nun aperis 163 terminaroj por diversaj sciencaj branĉoj, fakoj kaj aliaj specialaj sferoj. Multnombraj fakaj terminoj estis difinitaj en *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (1970, de G. Waringhien).



Emile Grosjean-Maupin (1863-1933), la patro de *Plena Vortaro de Esperanto.*



Prof. Gaston Waringhien kun la manuskripto de *Plena Ilustrita Vortaro*, antaŭ ol transdoni ĝin al la eldonisto (julio 1966).



Mag. Vilho Setälä aŭtoris la tre sukcesan internacian lernolibron *Privilegia Vojo.*

Aro da internaciaj lernolibroj por progresintoj kaj superaj kursoj ebligas profundigon de la scio akirita sur pli malalta nivelo. Al tiu ĉi speco apartenas, ekzemple, *Daŭriga Kurso post Cseh-Kurso* de Margarete Saxl; *Fundamenta Krestomatio, Proverbaro Esperanta* kaj *Fundamento de Esperanto,* ĉiuj de L. L. Zamenhof; *Ellernu!* de F. Szilágyi kaj tuta aro da aliaj, egale uzeblaj por ĉiuj, kiuj deziras daŭre perfektigadi sian lingvoscion, same kiel en superaj kursoj aŭ en kursoj por instruistoj de Esperanto.

4.3.3 Libroj por Superaj Kursoj kaj Instruistoj

Tute malgranda biblioteko da altvaloraj verkoj troviĝas en tiu ĉi kategorio, gravega por scienca studado de Esperanto en ĉiuj ĝiaj lingvaj kaj instruaj aspektoj.

Apenaŭ necesas diri, ke la bazaj studlibroj estas la verkoj de Zamenhof, unuavice *Fundamento de Esperanto,* precipe ĝia 9-a eldono kun enkondukoj kaj lingvaj rimarkoj de A. Albault; *Lingvaj Respondoj,* precipe la 6-a eldono preparita de G. Waringhien; *Originala Verkaro,* redaktita de J. Dietterle.

La plej grava verko por la studo de la gramatiko de la Internacia Lingvo estas *Plena Gramatiko de Esperanto* de K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Ĝin kompletigas *Vojaĝo inter la Tempoj* de K. Kalocsay. Aliaj aparte menciindaj verkoj estas *Fundamentaj Reguloj de la Vortteorio en Esperanto,* Raporto al la Akademio Esperantista, verkita de D-ro René de Saussure, tiama prezidanto de la Komisiono pri Vortfarado; *Aktoj de la Akademio,* eldonita de la Akademio de Esperanto; *La Zamenhofa Esperanto* kun kontribuoj de diversaj aŭtoroj.

La plej grandaj vortaroj estas *Plena Ilustrita Vortaro* de G. Waringhien (ĉefred.) en kunlaboro kun multaj elstaraj aŭtoroj; *Plena Vortaro de Esperanto* de E. Grosjean-Maupin (k.a.); *Plena Vortaro de Esperanto kun Suplemento* de E. Grosjean-Maupin, G. Waringhien k.a.; *Zamenhof-Radikaro kun Derivaĵoj kaj Fontindikoj* de E. Wüster; *Naŭlingva Etimologia Leksikono* de L. Bastien, kiel ankaŭ diversaj, jam tre multnombraj, fakterminaroj.

La stilon pritraktas pluraj verkoj kaj multaj studoj. Elstaras *Lingvo-Stilo-Formo* de K. Kalocsay; *Esprimo de Sentoj en Esperanto* de E. Privat; *Zamenhofa Stilo kaj Moderna Stilo* de Nakamura t.

Parnasa Gvidlibro de K. Kalocsay, G. Waringhien kaj R. Bernard restas la plej bona verko por la teorio kaj praktiko de tradicia poezio en Esperanto.

4.3 LERNOLIBROJ KAJ INSTRUAJ HELPILOJ

Aliflanke la parolarton kaj ĝenerale la parolan stilon pritraktas *Retoriko* de I. Lapenna. Tiun verkon kompletigas *Paroladoj kaj Poemoj* de L. L. Zamenhof kaj *Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj* de I. Lapenna.

Sur la kampo de metodiko la plej konataj estas *Metodiko de la Esperanto-Instruado* de R. Rakuŝa kaj *Esperanto kaj Lernejo* de P. Zlatnar (red.) kun multaj valoraj kontribuoj.

Multnombraj estas la verkoj, studoj kaj artikoloj rilatantaj al la historio de internacia lingvo, historio de la Esperanto-Movado aŭ de diversaj ĝiaj branĉoj kaj fakoj. La plej rimarkindaj libroj estas *Historio de la Mondolingvo* de E. Drezen; *Historio de la Lingvo Esperanto* en du volumoj de E. Privat; *Historio de SAT.* Studinda estas *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro* (red. I. Lapenna).

Same multnombraj estas la libroj kaj artikoloj rilatantaj al esperantologio kaj lingvistiko, sed elstaras *Lingvo kaj Vivo* de G. Waringhien. Ĝi enhavas esperantologiajn eseojn pri etimologio, vortfarado, stilistiko, sintakso, gramatiko, leksikologio, literaturo kaj interlingvistiko. Tre valorajn esperantologiajn studojn enhavas la du volumoj de *Esperantologio* (entute 6 grandformataj kajeroj) sub la redakto de D-ro P. Neergaard. Kvankam tiu periodaĵo ne plu aperas, tamen la publikigitaj studoj konservas siajn signifon kaj aktualecon. Alia menciinda periodaĵo estas *Interlingvistika Informa Servo,* redaktata de D-ro A. Bormann. Ne malhavebla por universitataj kaj ĝenerale superaj studoj estas la nuntempa *La Monda Lingvo-Problemo,* redaktata de 12-persona Redakta Komitato (ĉefred. D-ro V. Sadler), konsistanta el specialistoj, kelkaj mondkonataj, sur la kampoj de lingvistiko, filologio, leksikologio, terminologio, psikologio kaj juro. Temas pri internacia, interdisciplina revuo por la pristudo de la lingva problemo en ĉiuj ĝiaj aspektoj. Ĝi estas eldonata de Mouton & Co., Hago-Parizo, sub aŭspicio de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo.

Por helpi al perfektigo de supera instruado, UEA formis apartan komisionon. La nuna Regularo por la Internacia Ekzamena Komisiono ekvalidis komence de marto 1961. La celo de IEK, kiel aparta kultura kaj eduka institucio de UEA, estas altigi ĝenerale la nivelon de instruado de la Internacia Lingvo kaj atesti, surbaze de rigora ekzameno, la kapablon instrui Esperanton je supera nivelo. IEK konsistas el nedifinita nombro da membroj kaj ĝi formas, por la ekzamenoj mem, apartajn ekzamenajn komisionojn, konsistantajn el 3-5 membroj de IEK. La ekzameno estas sur tre alta nivelo, simila al la nivelo de universitataj ekzamenoj por instruado de kiu ajn lingvo. Nuntempe IEK konsistas el 11 membroj el 7 nacioj. Sekretario estas D-ro J. C. Wells, lektoro *(lecturer)* pri angla fonetiko en la Universitato de Londono.

4.3.4 Helpaj Instruaj Rimedoj

La memlernantojn kaj instruistojn de Esperanto helpas en la lernado, resp. instruado, diversaj aldonaj rimedoj: legolibroj, diskoj kaj kantoj, magnetofonaj bendoj, kantaroj, radio-elsendoj, korespondado.

Inter la legolibroj la unuan lokon okupas *Paŝoj al Plena Posedo* de W. Auld. Kompilita el verkoj de diverslandaj aŭtoroj, ĝi enhavas ankaŭ vortaron kaj ekzercojn. *Karlo* de E. Privat estas versaĵne la plej vendata el ĉiuj legolibroj. Tiu ĉi verko ne estas tre simpla, sed enhavas interesan legaĵon por infanoj. Alia legolibro, plu multe uzata en kursoj, estas *La Verda Koro* de J. Baghy. La legolibro de Miyamoto masao *De Sezono al Sezono* estas aparte alloga, ĉar ĝi enhavas tekstojn parte el jam klasikaj verkoj, parte el nuntempaj kaj parte rilatantaj al orienta kuracarto. Inter la aliaj legolibroj, estas menciinda *Legu kaj Ridu* (red. Schmidt). Por infanoj taŭgas *La Junaj Trezorserĉantoj* kaj *La Junaj Detektivoj* de J. H. Sullivan. *Mary kaj Sulo* estas ĉarma noveleto en formo de korespondado inter brita knabino kaj finna knabo. Miyamoto masao produktis du pliajn legolibrojn — *Facilaj Legaĵoj* kaj *Rakontoj de Eroŝenko* — bone uzeblaj ankaŭ internacie malgraŭ la parte japanlingvaj tekstoj.

Abunda literaturo por infanoj kaj komencantoj kompletigas la legolibrojn. En tiu ĉi grupo apartan valoron havas *Bildlibro pri Bestoj* de diversaj aŭtoroj (trad. W. A. Gething), belega donaco por geknaboj kaj samtempe tre utila libro por serioza studanto, precipe por la interesiĝantoj pri la animala mondo, ĉar la libro enhavas artikolojn kaj ilustraĵojn pri la kvin klasoj de la vertebruloj kaj ses el la klasoj de senvertebruloj. En ĝi troviĝas bildoj kun Esperantaj nomoj de pli ol 400 animaloj. Alia libro pri bestoj, taŭga precipe por junaj denaskaj Esperantlingvanoj, estas *Kun Niaj Amikoj, La Bestoj*. Libro rekomendinda el la vidpunkto de edukado al internaciismo estas *La Sep Reĝidoj* de Béla Balázs: luksa infanlibro riĉe ilustrita. *La Ŝtelita Lampo* de V. Winkler (trad. J. Kozlevčar), ilustrita en koloroj, estas plia libro konvena por infanoj. Nombro da libroj kun facilaj legaĵoj rilatas al unuopaj popoloj kaj kontribuas al internacia kompreniĝo. Estu menciitaj nur kelkaj: *Ĉeĥaj Fabeloj* de Valda Vinař; *El Afriko* de D. Faux; *Italaj Rakontoj* de De Amicis; *Japanaj Fabeloj* de Ŝimomura; *Rakontoj pri Liu Hulan; Sankta Nikolao en Nederlando.*

Por daŭrigaj kursoj kaj ĝenerale por progresintoj estas rekomendindaj *Fabeloj de Andersen, La Novaj Vestoj de la Imperiestro kaj Du Aliaj Fabeloj, La Marvirineto,* verkoj de Andersen bone konataj en la tuta mondo.







Mondskalaj kulturaj interŝanĝoj: Titolpaĝo de *Grajnoj en Vento* kaj pentraĵo de 9-jara knabino el Kioto (supre); internacia ekspozicio de infandesegnaĵoj, Barcelona 1972.

4 INSTRUADO DE ESPERANTO

Alia grava helpilo, precipe por la prononco kaj akirado de flua parola lingvo, estas la gramofondiskoj kaj sonbendoj.

La listo de gramofondiskoj fariĝas ĉiam pli longa. Inter ili pluraj aparte taŭgas por instruaj kaj lernaj celoj. Jen kelkaj: *Esperanto-Prononcado por Anglalingvanoj* de D-ro J. C. Wells, lektoro pri fonetiko en la Londona Universitato; pluraj diskoj de Ivo Lapenna, inter kiuj *La Festparolado en la Inaŭguro de la 49-a UK en Hago, Kultura Valoro de la Internacia Lingvo,* kaj *Kia Devas Esti Internacia Lingvo por Plenumi Ĉiam pli Efike Tiun Rolon?,* disko ankaŭ kun *Mia Sopirata Naskiĝlando* de Ljuba Knjažinskaja-Lapenna; *Internacia Elparolo,* la plej sukcesa disko de UEA kun prononc-instrua legado de personoj apartenantaj al 5 nacioj: M. Sudec, Marianne Vermaas, G. Pompilio, W. Schmid kaj la prezentanto Victor Sadler; *Perfekta Prononcado* kun la voĉoj de Peyronnet-Flego, Rodriguez kaj Emilija Lapenna. Kelkaj modernaj kursoj estas akompanataj de diskoj aŭ sonbendoj. Inter ili elstaras *Ĉu Vi Parolas Esperante? Kurso por Komencantoj* de A. Pettyn kaj *Esperanto-Programita* de H. Behrmann.

La Magnetofona Servo de UEA, fondita en 1957 kaj gvidata de Rüdiger Eichholz en Kanado, disponas pri ĉ. 300 diversaj sonbendoj kun paroladoj, prelegoj, monologoj, teatraĵoj kaj aliaj tekstoj. Multaj el ili taŭgas por perfektigi la prononcon. Similan rolon plenumas la radio-elsendoj en la Internacia Lingvo: ĉiutage oni povas aŭskulti diversajn staciojn, plej ofte kun vere modela pronoco. Multnombraj kantaroj kun internacia karaktero ebligas formi kantĥorojn aŭ aranĝi komunan kantadon, kio siavice helpas al pli bona mastrado de la lingvo. Al ĉio ĉi necesas aldoni diversajn periodaĵojn kun facilaj legaĵoj, kaj internacian korespondadon. Tiu lasta estas bonege organizita en la kadro de la Koresponda Servo Mondskala, fondita de UEA en 1957 kaj gvidata jam dum multaj jaroj de f-ino C. Hueter en Francio. KSM kunlaboras kun Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj en la organizado de interlerneja korespondado. Similan funkcion realigas la modela *Grajnoj en Vento,* iniciatita kaj gvidata dum multaj jaroj de Marcel Erbetta en Svislando. La celo de GEV estas ebligi kulturajn interŝanĝojn inter gelernantoj, aktivigi la infanojn al interpopola kunlaboro kaj progresigi la instruadon de la Internacia Lingvo en la lernejoj. Ĝi sukcese laboras sur tiu kampo organizante „rondojn" de deko da klasoj aŭ grupoj, kiuj eldonas tri fojojn jare komunan periodaĵon, ĉiam kun la sama titolo „Grajnoj en Vento", kaj kun kontribuoj nur de la junaj gelernantoj.

En ligo kun ĉio dirita oni devas ne forgesi la rolon de la lokaj Esperanto-societoj kaj de aliaj Esperanto-organizaĵoj. En la mondo

nun ekzistas ĉ. 1.500 Esperanto-societoj, el kiuj multaj funkcias modele. La regulaj kunvenoj de la lokaj societoj estas la lokoj, en kiuj daŭre vivas kaj evoluas la parolata lingvo, kaj tial ili estas, aldone al siaj aliaj agadoj, konstantaj lernejoj de la Internacia Lingvo. Por komencanto aŭ eĉ progresinto, precipe por memlernantoj, ne ekzistas pli bona lernejo por perfektigi la lingvoscion ol estas loka Esperanto-societo, en kiu pulsas vivo kaj en kiu oni aŭdas nur fluan, korekte prononcatan Esperanton.

Kombino de ĉiuj pritraktitaj rimedoj kaj helpiloj faciligas la lernadon kaj fortikigas la unuecon de la lingvo el ĉiuj vidpunktoj, inkluzive korektan prononcon. Kelkaj el tiuj rimedoj taŭgas nur por lernejaj aŭ eksterlernejaj kursoj. Aliaj — ekzemple diskoj, sonbendoj aŭ radio-programoj — estas tre bone utiligeblaj ankaŭ de memlernantoj. Unu afero estas certa: se oni vere deziras ellerni la Internacian Lingvon kaj daŭre perfektigadi sian scion, ne mankas rimedoj por atingi tion.


4.3.5 Postredakta Noto

Post la finredakto de tiu ĉi verko aperis aro da novaj lernolibroj. Tri el ili meritas apartan mencion. La unua estas *Je Parle Esperanto,* verkita de Jean Thierry laŭ la „Flash-metodo" kaj eldonita en 50.000 ekzempleroj de la fama Marabout Flash, kiu havas pli ol 900 vendejojn en Francio kaj en aliaj france parolantaj landoj. La dua estas *A First Course in Esperanto* de William Auld, publikigita de Channing L. Bete Co., Inc. en Usono. La tria estas *L'Espéranto sans peine* de Jean Thierry, eldonita de la mondfama Assimil fine de 1973 en Parizo. La du lastajn lernolibrojn kompletigas sonbendoj.

4.4 INSTRUMETODOJ

La plej malnova, pure gramatika, metodo estas entenata en la *Fundamento de Esperanto.* Kiel montrite, ĝi konsistas el tri partoj kaj en la unua parto troviĝas la 16 fundamentaj reguloj de la Esperanta gramatiko. Kompreneble, neniu alia lingvo estas ellernebla, des malpli sen instruisto, el tiel malabunda materialo. En Esperanto tio estas ebla pro ĝia relative granda facileco kaj simpleco de la gramatika strukturo. Praktike, ĉiuj personoj, kiuj ellernis la lingvon en la 19-a jarcento, akiris sian lingvoscion laŭ tiu maniero. Ankaŭ nuntempe troviĝas tre multaj, kiuj ellernis la lingvon laŭ la sama metodo.

Antaŭ la Unua Mondmilito estis kutimo aldoni al la lernolibroj apartan „ŝlosilon", t.e. solvaron de ekzercoj kaj traduktaskoj, por ke la lernanto povu mem kontroli la korektecon de siaj ellabora-



La rekta metodo de A. Cseh dum jardekoj notadis spektaklajn rezultojn.





Hermann Behrmann (supre) viciĝis inter la plej sukcesajn pedagogojn.

Tiberiu Morariu (maldekstre) estis tre populara Cseh-instruisto.

ĵoj. Tio faciligis la studadon de la lingvo, precipe al memlernantoj.

Inter la du mondmilitoj aperis multaj novaj lernolibroj, pli taŭgaj, ĉar aranĝitaj laŭ nova metodo, kiun karakterizas pli interesa enhavo: mallongaj rakontoj, tekstoj rilatantaj al la ĉiutaga vivo, simplaj artikoletoj k.s., anstataŭ nudaj ekzercaj frazoj sen ia reciproka kunligo.

En la dudekaj jaroj Andreo Cseh (Ĉe), kiu instruis Esperanton al alilingvanoj, enkondukis tute novan, rektan metodon. Ĝi dankas sian ekziston al la fakto, ke A. Cseh devis gvidi kurson de Esperanto por diversnaciaj gelernantoj, plejparte laboristoj. Tio okazis en 1920 en la transsilvania urbo Sibiu (Rumanio). Lernolibroj ne ekzistis, kaj mendi ilin el eksterlando ne estis eble, ĉar la limoj estis ankoraŭ fermitaj. Cseh tiam decidis ne fari kurson en la ordinara senco de la vorto, sed simplan konversacion. Nigra tabulo kaj kreto helpis la instruiston, papero kaj krajono la lernantojn. La instruisto parolis en la komenco pri aferoj plej proksimaj al la ĉiutaga vivo kaj uzis nur la plej simplajn gramatikajn elementojn. Iom post iom li transiris al temoj pli malproksimaj kaj al pli malfacilaj gramatikaj reguloj. Post dudek lecionoj de du horoj la lernantoj jam povis interparoli en Esperanto. La sukceso estis grandega. La bona rezulto instigis al organizo de similaj kursoj en tuta Rumanio, kaj poste sekvis invitoj al aliaj landoj. En 1930 estis fondita en Hago Internacia Ĉe-Instituto, kies ĉefa celo estis eduki novajn geinstruistojn laŭ tiu metodo. Efektive, en nuraj kelkaj jaroj kreiĝis tuta malgranda armeo da Ĉe-instruistoj, kiuj, aldone al la kursoj de Cseh mem, instruis Esperanton en tre multaj landoj kaj konsiderinde kontribuis al disvastiĝo de la lingvo. Ankaŭ nuntempe troviĝas geinstruistoj, aplikantaj tiun metodon, precipe sukcesan en medioj sen kono de gramatikaj subtilaĵoj, kiujn donas mezgrada instruiteco.

La principoj de la metodo estas: neuzado de lernolibroj; neuzado de nacia lingvo, sed klarigo de la novaj vortoj per la jam lernitaj; komuna respondado de la kursanoj al la demandoj; aplikado de konversacio pri aktualaĵoj anstataŭ uzado de sekaj ekzemploj; abunda aplikado de humoro kaj ŝercoj; klopodo atingi, ke la lernantoj mem eltrovu la regulon entenatan en la ekzemploj. La sukceso de la kurso laŭ tiu metodo multe dependas de la talento kaj personeco de la instruisto.

Interesan metodon liveris ankaŭ Prof. E. Privat en sia *Kursa Lernolibro,* instruilo por komencantoj, verkita nur en Esperanto. Ankaŭ tiu ĉi metodo estas multe uzata kaj taŭgas por paroligi.

Miksitan metodon, kiu troviĝas ie en la mezo inter la gramatika kaj rekta, prezentas preskaŭ ĉiuj gravaj lastjaraj naciaj kaj inter-

naciaj lernolibroj. La materialo estas kutime dividita en 10-30 lecionoj, kiuj en interesa maniero prezentas temojn por konversacio. La ĉefa celo estas instrui la gramatikajn regulojn kaj paralele paroligi la lernantojn. En tiu ĉi lasta periodo oni ĉiam pli utiligas aŭdajn rimedojn, eĉ lingvajn laboratoriojn. La menciita lernolibro de A. Pettyn *Ĉu Vi Parolas Esperante? — Kurso por Komencantoj* en la pola konsistas el skribita teksto kaj kvar gramofonaj diskoj. La diskoj enhavas parolon nur en Esperanto kaj tial estas bone uzeblaj internacie. La tuta Esperanta teksto de la diskoj estas trovebla ankaŭ en la lernolibro.

Tre grandan sukceson atingis en la lastaj jaroj *Esperanto-Programita* de H. Behrmann. Sian agadon li unue komencis en Germanio kaj en germane parolantaj regionoj, sed poste vastigis ĝin al aliaj landoj. En la unuaj ses monatoj pli ol 4.000 personoj, ĉefe en la landoj de Okcidenta Eŭropo, interesiĝis pri tiu sistemo kaj eklernis la lingvon. En 1971 kaj 1972 *Esperanto-Programita* aperis ankaŭ en la nederlanda kaj angla. La lernanto ricevas modernan lernolibron kaj gramofonajn diskojn. La baza principo estas „aŭskultu kaj ripetu" kiel la plej efika metodo por ellerni lingvon. Gramofonajn diskojn utiligis Linguaphone por sia kurso de Esperanto.

La kursoj de Esperanto per radio kaj televido aplikas metodojn, kiujn nuntempe radio kaj televido uzas por instruado de diversaj lingvoj.

Necesas ne forgesi, ke neniu metodo per si mem sufiĉas, se forestas firma deziro plene ekregi la lingvon. Scio pri la kulturaj valoroj jam kreitaj en la Internacia Lingvo aŭ per ĝi, pri la vasta gamo de eblecoj utiligi ĝin por pure praktikaj celoj, kaj pri ĝia idea signifo devas troviĝi en la bazo de ĉiu ajn metodo.

4.5 EKSTERLERNEJA INSTRUIĜO

4.5.1 Memlernantoj

Se oni povis akiri bonan scion de Esperanto en la unua periodo el la tiamaj tre modestaj lernolibroj, des pli facile oni povas lerni la lingvon hodiaŭ, kiam ekzistas multaj taŭgaj lernolibroj kaj naciaj kaj internaciaj, elstaraj legolibroj, abunda literaturo ankaŭ por komencantoj; kiam, krome, gramofonaj diskoj kaj sonbendoj kun modela prononco, radio-elsendoj kaj aliaj helpiloj troviĝas je dispono de serioza memlernanto. Bona lernolibro en nacia lingvo kun baza vortaro, internacia legolibro kaj unu aŭ pluraj helpaj teknikaj rimedoj ebligas ekregon de la lingvo.

Obseditaj certagrade de la propagando, kutime kun komerca karaktero, laŭ kiu diversaj aŭdovidaj metodoj, lingvaj laboratorioj k.s. kvazaŭe ebligas ellernon de lingvoj en mirakle mallonga tempo, la Esperanto-organizaĵoj iom neglektis tiun ĉi formon de lernado, kvankam ĝi plu estas tre grava. Nun oni denove dediĉas al ĝi pli da atento. La landaj Esperanto-organizaĵoj aktiviĝas en eldonado de novaj lernolibroj aŭ reeldonado de malnovaj, jam pruvitaj kiel bonaj kaj konformaj al la modernaj bezonoj. Tiurilate estas karakteriza la Baza Laborplano de Itala Esperanto-Federacio (1972), en kiu troviĝas, interalie, ankaŭ jena ero: renovigo de la ekzistanta instrumaterialo por tradiciaj kursoj (gramatiko, vortaro k.a. lerniloj).

4.5.2 Kursoj de Esperanto-Societoj

Kvankam Esperanto estas facile lernebla por memlernantoj, tamen multaj ne estas kapablaj ellerni laŭ tiu maniero, sed bezonas helpon de profesia instruisto aŭ almenaŭ de instruanto, kiu jam bone scias la lingvon. Multajn eblecojn prezentas la diversgradaj kursoj regule aranĝataj de la lokaj Esperanto-societoj. Tiuj kursoj, kutime vesperaj, daŭras 3-6 monatojn (precipe en slavaj landoj) ĝis maksimume 2 jaroj. La necesa longeco de la kurso dependas multe de la instruiteco de la gelernantoj kaj de kelkaj aliaj faktoroj.

Estas tre malfacile eltrovi kiom da kursoj de Esperanto por komencantoj okazas ĉiujare en la kadro de la lokaj Esperanto-societoj aŭ kun ilia helpo. Laŭ enketo, kiun siatempe faris CED, en la lerneja jaro 1950-51 estis gviditaj entute 1.267 kursoj por komencantoj en 29 landoj. Pri ĉiuj aliaj landoj, inter kiuj kelkaj tre grandaj kaj gravaj ankaŭ el vidpunkto de la Esperanto-Movado, ekzemple pri Japanio kaj Ĉinio, komplete mankis informoj, sed ankaŭ en ili tutcerte okazis tiaj kursoj. En la statistiko ne estis enkalkulitaj la korespondaj kursoj, ĉar ili estas daŭraj kaj la nombro de gelernantoj senĉese ŝanĝiĝas.

Se oni konsideras, ke nuntempe funkcias pli-malpli bone ĉ. 1.500 lokaj societoj kaj ke meze ĉiu el ili aranĝas almenaŭ unu kurson por komencantoj ĉiujare, oni povas sen troigo taksi, ke la nombro de tiaj kursoj estas ĉ. 1.500 jare.

Pluraj landaj Esperanto-asocioj, ekzemple la brita, franca, nederlanda, pola, prizorgas konstantajn korespondajn kursojn. En kelkaj kazoj ankaŭ lokaj societoj, precipe la pli fortaj, havas tiajn kursojn. Nenio malhelpas, ke entreprenema unuopulo instruu laŭ la sama maniero. Ekzemple, P. Delaire (Francio) kaj H. Lingua (Argentino) instruas laŭ tiu maniero, kaj atingas tre kontentigajn sukcesojn. La saman principon aplikas ankaŭ *Esperanto-Programita* de H. Behrmann.

Necesas ĉi tie mencii ankaŭ diversajn internaciajn kursojn, kiuj okazas ĉu regule, ĉu en ligo kun iu aparta internacia renkontiĝo. Konataj estas la kursoj de diversaj gradoj, regule organizataj en la Esperantista Kulturdomo en Grésillon (Francio); La Internaciaj Feriaj Esperanto-Kursoj en Internacia Altlernejo de Helsingør (Danlando); la diversaj kursoj en Primošten (Jugoslavio).

4.5.3 Aliaj Kursoj

Depende de la pozicio de Esperanto en unuopaj landoj kaj, grandparte, de la rolo, kiun ludas la loka Esperanto-societo, multaj kursoj okazis kaj plu okazas en diversaj neesperantistaj organizaĵoj, ekzemple en sindikatoj, domoj de kulturo, lokaj edukaj instancoj, popolaj universitatoj kaj similaj institucioj. En ligo kun tio, apartan atenton meritas la Koordinitaj Vintraj Kursoj, iniciatitaj siatempe de D-ino Tina Peter-Ruetschi kaj organizitaj de la Popola Universitato en Zürich. La unua kurso okazis en la vintra sezono en 1952-53. Ĝi komenciĝis paralele kaj kun esence identa instrumaterialo en Zürich, Hago, Manchester kaj Helsinki. La iniciato donis bonajn fruktojn kun kontentigaj rezultoj. En la vintra sezono de 1963-64 la nombro de partoprenintaj popolaj universitatoj aŭ similaj edukaj institucioj estis: Aŭstrio 1, Britio 6, Finnlando 2, Francio 1, Germanio 2, Italio 2, kaj Svedio 1, entute 15 institucioj en 7 landoj.

Relative granda nombro da kursoj estas faritaj en gazetoj kaj periodaĵoj. CED havas informojn pri 63 gazetoj kaj aliaj periodaĵoj en Nederlando, Francio, Jugoslavio, Svedio, Norvegio, Venezuelo, Germanio, Svislando, Soveta Unio kaj Italio, kiuj prezentis kursojn de Esperanto inter 1951 kaj 1972. Verŝajne la plej grandan sukceson havis la kurso en la nederlanda gazeto *Posthoorn*, kiun partoprenis pli ol 1.500 gelernantoj en 1959.

Kursoj de Esperanto per radio komenciĝis en la tridekaj jaroj. Laŭ *Enciklopedio de Esperanto*, en 1933 diversaj radio-stacioj disaŭdigis 409 kurshorojn.

Post la Dua Mondmilito pluraj radio-stacioj enkondukis kursojn de la Internacia Lingvo paralele kun kursoj de aliaj lingvoj. Tiajn kursojn disaŭdigis, ekzemple, la radio-stacioj de Parizo, Perpignan, Lille, Graz, Vieno, Osijek, Beograd, Ljubljana, Rio de Janeiro, Columbus, k.a.

En 1970 Esperanto-kursojn prezentis la radio-stacioj de Muritiba kaj Sorocaba en Brazilo; Stoke-on-Trent en Britio; Clermont-Ferrand en Francio; Columbus (Ohio) en Usono. Aldone al tiuj stacioj, en 1971 Esperanto-kursojn havis ankaŭ la radio-stacio Sabadell en Hispanio. Tiuj radio-stacioj plu disaŭdigas kursojn en 1972. En januaro de 1972

komenciĝis radio-kurso de la Universitata Radio en Tananarive en Madagaskaro.

En 1972 Esperanto fine penetris ankaŭ en televidon. Kompreneble, informoj aŭ programoj en ligo kun Esperanto, intervjuoj aŭ diskutoj estis prezentitaj ankaŭ pli frue de diversaj televidaj stacioj, precipe okaze de Universalaj Kongresoj de Esperanto aŭ okaze de aliaj gravaj internaciaj Esperanto-konferencoj kaj renkontiĝoj. Sed la unua kompleta televida kurso de Esperanto estis prezentita nur en 1972 en Nederlando. Ĝin prizorgis TELEAC. La kolora filmo, en kiu rolis du konataj nederlandaj komediistoj, komenciĝis en januaro. La nederlanda gazetaro kaj la programaj revuoj de Radio kaj Televido donis vastan atenton al la kurso. En 1972 komenciĝis televida kurso de 26 duonhoraj lecionoj ankaŭ en Pittsfield (Mass.) en Usono. Tria televida kurso estas preparata por la slovaka televido en Bratislava en Ĉeĥoslovakio.

4.6 LERNEJOJ KAJ UNIVERSITATOJ

4.6.1 Agadoj en Lernejaj Medioj

4.6.1.1 *Antaŭ la Dua Mondmilito.* — Jam en la frua epoko de Esperanto oni dediĉadis grandan atenton al enkonduko de la lingvo en la lernejojn kiel studobjekto. En multaj kazoj la klopodoj atingis la celon kaj Esperanto estis instruata en diversgradaj lernejoj de pluraj landoj, ĉefe en tiuj kun jam formiĝinta Esperanto-Movado. Se oni sukcesis enkonduki la lingvon en iun lernejon, tio estis pli rezulto de agado de kompetenta unuopulo kaj de la komprenemo de la lokaj edukaj aŭtoritatoj, aŭ eĉ nur de la lerneja direktoro, ol de la ĝenerala eduka politiko de la koncerna lando. Tial, nur en maloftaj kazoj la instruado de Esperanto havis daŭran karakteron; ankoraŭ pli malofte oni instruis ĝin en deviga formo.

Kvankam oni scias, ke Esperanto estis instruata en la lernejoj, kion atestas informoj en la tiamaj periodaĵoj kaj aliaj fontoj, tamen mankas precizaj sciigoj pri la nombro de lernejoj laŭ iliaj gradoj kaj laŭ la landoj.

Post la Unua Mondmilito la agado estis renovigita kaj la rezultoj estis pli kontentigaj, interalie ankaŭ tial, ĉar konsiderinde grandiĝis la nombro de geinstruistoj kun posedo de Esperanto.

En 1924, dum la UK en Vieno, 200 geinstruistoj fondis internacian fakan organizaĵon kun la nomo *Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE).* Ĝia ĉefa celo estis unuigi ĉiujn instruistojn kun scio de Esperanto por povi pli efike agadi favore al enkonduko de la Internacia Lingvo en la lernejojn. Jam en 1925 la Jarlibro de

TAGE enhavis la adresojn de pli ol 2.000 geinstruistoj sciantaj Esperanton.

Klopodoj estis faritaj ankaŭ sur internacia nivelo, precipe ĉe Ligo de Nacioj. Post la favora raporto de D-ro Nitobe, la tiama Ĝenerala Vicsekretario de la Ligo, pri la pozitivaj spertoj, kiujn li havis dum la UK en Prago (1921)[2], la Ligo entreprenis enketon pri la stato de Esperanto en la mondo kaj, aparte, pri la eblecoj vastigi ĝian instruadon en la lernejoj. La Konferenco pri Lernejoj, okazinta en 1922 en la Palaco de la Ligo en Ĝenevo, siavice liveris utilan materialon. La Konferencon organizis la Pedagogia Instituto J. J. Rousseau en Ĝenevo; partoprenis tre multaj geinstruistoj el 28 landoj kaj 16 oficialaj reprezentantoj de registaroj. En ligo kun tio, alia agado estis farata en la direkto de interŝtata konvencio pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn, sed ankaŭ tiu laboro ne kondukis al iaj pozitivaj sekvoj.

Siavice, TAGE efike agadis en pedagogiaj medioj. Ĝi havis viglajn rilatojn kun internaciaj instruistaj kaj edukaj asocioj, kun Internacia Eduka Oficejo kaj kun Internacia Profesia Sekretariejo de Instruistoj (Strasburgo). Tiu lasta mem prenis la taskon disvastigadi Esperanton. Okaze de sia kongreso en Hamburgo (1931) ĝi aranĝis oficialan Esperanto-Vesperon, dum kiu konataj pedagogoj el diversaj landoj pledis por Esperanto.

Tiun multflankan agadon abrupte interrompis la venko de naziismo en Germanio kaj la politikaj sekvoj de tiu tragika evento ne nur en Eŭropo, sed ĉie en la mondo. La negativa sinteno de naziismo al Esperanto — tute natura, ĉar tia plej ekstrema naciismo-rasismo, unuflanke, kaj internaciismo, kies lingva esprimo estas la Internacia Lingvo, aliflanke, neniel povas kunekzisti — kaŭzis detruon de la Esperanto-Movado en Germanio kaj ĝeneralan malfortikigon preskaŭ ĉie en la mondo[3]. Viktimo estis ankaŭ TAGE, kies germana sekcio havis pli ol 500 membrojn, kaj entute la klopodoj vaste enkonduki Esperanton en la lernejojn surbaze de internacia interkonsento.

Ankaŭ pri la intermilita periodo mankas kompletaj kaj precizaj informoj rilate la faktan instruadon de la lingvo en la lernejoj.

En universitataj medioj sukcese agis *studentaj aŭ akademiaj Esperanto-kluboj* en pluraj landoj. Ili disvastigadis la lingvon inter la studentaro kaj aranĝadis specialajn kursojn por gestudentoj, kutime en la universitatoj mem. La plej aktiva el ili sendube estis la studenta, poste Akademia Esperanto-Klubo en Zagreb (1929-1941), kiu ĝis aprilo de 1941, kiam la naziaj-faŝistaj armeoj invadis Jugoslavion, funkciis ankaŭ kiel administra centro de Studenta Tutmonda

2. Pri Esperanto antaŭ Ligo de Nacioj v. Ĉap. 22.2.
3. Pri tio v. Ĉap. 21.

Esperanto-Ligo (STEL-o). En tiuj kluboj formiĝis multaj aktivuloj, kiuj poste transprenis respondecajn taskojn ne nur en la landaj organizaĵoj, sed ankaŭ en la internacia Esperanto-Movado[4]. Fininte siajn studojn, la membroj eniris sian profesian vivon kaj en multaj kazoj atingis altajn funkciojn, kio siavice fortikigis la poziciojn de Esperanto.

La studentaj Esperanto-kluboj, krome, helpis al fondo de *lektoratoj* de Esperanto aŭ al firmigo de tiuj, kiuj jam ekzistis. La preciza nombro de tiuj lektoratoj en la vera senco de la vorto, aŭ de aliaj formoj de universitata instruado, ne estas konata. Kelkaj jam tiam estis firme establitaj, inter ili en la universitatoj de Ĝenevo (Prof. E. Privat), Liverpool (Prof. E. Collinson), Zagreb, Ekonomika Fakultato (D-ro D. Maruzzi); en la du teknikaj altlernejoj de Prago (ĉeña kaj germana) kaj en Vieno.

La naziismo kaj la Dua Mondmilito detruis ankaŭ tion.

4.6.1.2 *Postmilita Periodo.* — Post la finiĝo de la milito necesis rekomenci la laboron ankaŭ sur tiu kampo. Nova instruista Esperanto-organizaĵo estis fondita en 1949: *Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj (ILEI).* Unu el ĝiaj celoj estas, idente al la celoj de la antaŭmilita TAGE, progresigi la instruadon de Esperanto en lernejoj. Kompreno, ke realigado de tiu celo multe dependas de la ĝenerala agado por la Internacia Lingvo, kaŭzis intiman kunlaboron inter ILEI kaj UEA: la du organizaĵoj subskribis kontrakton, laŭ kiu ILEI fariĝis kunlaboranta faka asocio de UEA.

Siavice, CED tuj donis helpon ankaŭ sur tiu kampo, antaŭ ĉio rilate al unu el la plej urĝaj taskoj: establi la faktan staton de instruado de Esperanto en lernejoj. La enketo de CED por 1953 havigis utilajn informojn pri la nombro de lernejoj kaj gelernantoj, nomoj de la geinstruistoj kaj precizaj adresoj. Tio, kiel ankaŭ aliaj dokumentoj de CED, faciligis la kunvokon de *Somera Pedagogia Semajno,* kiu okazis meze de 1957 en Kranjska Gora (Jugoslavio). Ĝi estis kunvokita de Jugoslavia Esperanto-Federacio (nun JEL) kaj de ĝiaj tri komisionoj — lerneja, lingva kaj por kultura kunlaboro — sub aŭspicio de la Nacia Unesko-Komisiono por Jugoslavio, rezulte unuavice de la konata Rezolucio de Unesko de 1954. En la konferenco estis profunde pritraktitaj, sur alta nivelo, demandoj ligitaj al instruado de Esperanto: metodiko, lernolibroj, teknikaj helpiloj, edukaj

4. Ekzemple, en la nuna Komitato de UEA troviĝas kelkaj antaŭaj membroj de la tiutempaj studentaj kluboj. Dum unu periodo, el sesdeko da komitatanoj de UEA, 6 siatempe estis membroj de AEK en Zagreb. Ankaŭ tiu fakto montras la gravecon de agado en universitataj medioj.

celoj de Esperanto-instruado, literaturo kiel eduka rimedo, eksterlernejaj agadoj de la gelernantoj, k.a. La tuta materialo troviĝas en la libro *Esperanto kaj Lernejo* (1959), redaktita de D-ro P. Zlatnar.

Rezulte de interkonsento kaj efika kunlaboro inter UEA kaj Jugoslavia Esperanto-Ligo, meze de 1963 (de la 28-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto) okazis en Beograd la *Unua Konferenco de Lernejoj*, en kiuj Esperanto estas instruata. Le ĉefa celo de la Konferenco estis prilumi ĉiujn problemojn ligitajn al la instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj. Ankaŭ tiu ĉi Konferenco okazis sub la aŭspicio de la Jugoslavia Unesko-Komisiono. Krom la reprezentantoj de la menciita Komisiono kaj de la jugoslaviaj Konsilantaro por Klerigo kaj Kulturo, Instituto por Esplorado de Lernejaj Aferoj kaj aliaj edukaj instancoj, la Konferencon ĉeestis kiel observantoj ankaŭ la oficialaj reprezentantoj de la dana Ministerio por Instruado kaj Klerigo, hungara Ministerio por Klerigo kaj Kulturo, Aŭstria Nacia Unesko-Komisiono kaj de pluraj instruistaj kaj pedagogiaj organizaĵoj. Partoprenis 214 profesoroj, instruistoj kaj pedagogoj el 20 landoj; kune kun la observantoj, entute ĉeestis 260 personoj. Krome, ĉeestis 22 gelernantoj el 5 landoj, por kiuj estis aranĝita aparta programo. Al la Konferenco estis prezentitaj 20 enkondukaj raportoj rilatantaj al la 5 ĉeftemoj: kontribuo de Esperanto al ĝeneralaj edukado kaj instruado; organizaj spertoj rilate la enkondukon de Esperanto en la lernejojn; plibonigo kaj modernigo de la instruado; liberaj aktivadoj de gelernantoj studantaj Esperanton; aktualaj organizaj problemoj. La raportoj estis publikigitaj en formo de 116-paĝa libro jam antaŭ la Konferenco, kio faciligis la laboron dum la plenaj sesioj kaj en la 5 komisionoj. Unu el la bazaj dokumentoj estis la Raporto de CED pri la stato de instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj en la lerneja jaro 1962-63. La Konferenco akceptis plurajn rezoluciojn, el kiuj unu rilatis al kreo de aparta lerneja komisiono [5].

Plenumante la dezirespriman de la Rezolucio adresita al UEA pri fondo de komisiono — akceptitan kaj aprobitan poste de la Komitato de UEA — la Estraro de UEA formis apartan komisionon kun la nomo *Konsulta Komisiono pri Lernejoj (KKL)*. Ĝi konsistis el Prof. I. Lapenna, E. Malmgren, R. H. M. Markarian kaj P. Zlatnar. Ĝia tasko estis kunordigi la tutan agadon en la lernejoj. La Komisiono tuj establis kontaktojn kun ILEI, TEJO, GEV (Grajnoj en Vento) kaj aliaj organizaĵoj kaj instancoj, kiuj en kiu ajn senco laboras en la sfero de lernejoj. KKL aparte petis la apogon de ILEI kaj efektive, en la posta stadio, tiu kunlaboro estis efika, tiel ke en la Komisionon

5. Ĉiuj rezolucioj aperis en *Esperanto*, 1963, n-ro 10, p. 163.

eniris ankaŭ reprezentantoj de ILEI. La unua kunsido de KKL okazis en la oficejo de CED en Londono la 1-an de februaro 1964. Estis detale pritraktitaj la plej taŭgaj formoj por la realigo de la decidoj de la Beograda Konferenco. La kunsido selektis la plej urĝajn taskojn, inter kiuj troviĝis jenaj: pro manko de pedagogia revuo, la Komisiono establos la necesajn kontaktojn kun la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata, per aparta informilo *Lerneja Bulteno,* kiu aperados en la revuo *Esperanto* kaj poste estos regule sendata kiel represaĵo al la lernejoj, kiuj aliĝos al la *Interlerneja Interkonsento* pri kunlaboro; por helpi al la infanoj akiri Esperantan literaturon kaj entute por kuraĝigi ilin en la lernado de la lingvo, KKL proponis la establon de *Fondaĵo Lernejoj;* KKL donis sian plenan apogon al *Grajnoj en Vento* kaj alvokis la geinstruistojn partopreni en tiu elstara eduka laboro; KKL ankaŭ rekomendis al la geinstruistoj abonigi siajn gelernantojn al diversaj infanaj kaj junularaj periodaĵoj; KKL instigis al interlerneja korespondado kaj konsilis vaste utiligi la servon de *Koresponda Servo Mondskala de UEA;* KKL ankaŭ decidis organizi la duan lernejan konferencon en 1965 en Londono. La membroj de KKL disdividis inter si la taskojn kaj la laboro komenciĝis. Ĉiuj decidoj de la februara kunsido estis realigitaj, kun la escepto de la dua konferenco, kiu, pro teknikaj kaŭzoj, ne povis okazi en Londono en 1965, sed okazis unu jaron poste en Graz. La unua numero de la Lerneja Bulteno aperis en la marta numero de *Esperanto,* 1964, kaj ĝi regule plu aperadas. Ĝis majo 1973 entute aperis 26 numeroj de tiu bulteno. La agado por pli firme kunligi la lernejojn bone progresis: en 1965 jam 129 lernejoj aliĝis al Interlerneja Interkonsento.

La *Dua Internacia Konferenco de Lernejoj* en kiuj Esperanto estas instruata okazis en Graz, Aŭstrio, de la 23-a ĝis la 28-a de julio 1966. La Konferenco estis organizita de la KKL kaj de la Loka Konferenca Komitato sub la prezido de J. Wesian. Ĝi estis sub aŭspicioj de la Aŭstria Nacia Unesko-Komisiono, UEA kaj ILEI. La Konferencon partoprenis 145 geinstruistoj kaj pedagogoj el 22 landoj de Aŭstralio, Azio, Ameriko kaj Eŭropo. Krome, ĉeestis 80 gelernantoj, por kiuj estis aranĝita aparta programo. La ĉefa celo de la Konferenco estis ekzameni la atingojn post la Unua Konferenco. Estis prezentitaj raportoj pri Asociiĝintaj Lernejoj de Unesko; pri la ĉefaj decidoj de la Beograda Konferenco; pri organizo de eksterlernejaj aktivadoj; pri la rilatoj kun internaciaj instruistaj organizaĵoj; pri la tiama situacio de instruado de Esperanto en diversaj landoj; pri Esperanto kiel ebla instrulingvo por afrikaj kaj aziaj landoj; pri unuecigo de ekzamensistemoj por Esperanto; pri la eduka valoro de la Esperanto-instruado en lernejoj (samtempe dokumento

de CED); kaj pri kelkaj aspektoj de Esperanta fonetiko. Tri komisionoj aparte diskutis tiujn punktojn de la raportoj, kiuj rilatis al la instruado de Esperanto en universitatoj, mezgradaj aŭ elementaj lernejoj. La fina Rezolucio de la Konferenco rilatas al edukado por internacia kompreniĝo kaj kunlaborado, kaj al la rolo kiun ludas la Internacia Lingvo. Krome, la Konferenco akceptis nombron da decidoj pri la vastigo de la instruado de Esperanto en la lernejoj; pli firma ligiĝo de la lernejoj, en kiuj la lingvo estas instruata; radioelsendoj kun programoj por infanoj kaj gejunuloj; pli bona utiligo de Esperantaj periodaĵoj por gelernantoj kaj gestudentoj; kreo de apartaj Esperanto-kluboj en lernejoj kaj universitatoj, k.a. Parto de tiuj decidoj estis poste realigita; la aliaj decidoj, ekzemple tiu pri la neceso formi Esperanto-rondojn aŭ klubojn en lernejoj kaj universitatoj, restas daŭre aktualaj.

KKL, kies konsisto plurfoje ŝanĝiĝis, daŭrigis sian laboron ĝis 1970. En tiuj kelkaj jaroj ĝi sukcese entreprenis multajn taskojn, kutime en kunlaboro kun ILEI, landaj Esperanto-asocioj kaj instruistaj organizaĵoj, aŭ kun CED rilate enketojn kaj esplorojn.

La ĉefaj taskoj de la KKL estis internacie kunligi la lernejojn, geinstruistojn kaj gelernantojn, vigligi iliajn kontaktojn kaj kuraĝigi la vastigon de Esperanto-instruado en la lernejoj. Interne de la Esperanto-Movado la Komisiono atingadis tion ĉefe per informoj kaj konsiloj en la Lerneja Bulteno, per multnombraj cirkuleroj kaj leteroj, kunvenoj pri lernejoj dum la UK, personaj kontaktoj, sciigoj kaj alvokoj per radio (Esperanto-fakoj), liverado de taŭgaj dokumentoj de CED por apogi proponojn pri enkonduko de Esperanto en lernejojn aŭ universitatojn de iu lando, k.s. En la eksteraj rilatoj gravan lokon okupis personaj vizitoj al ministerioj pri edukado aŭ kulturo de pluraj landoj, kaj konferencoj kun iliaj respondecaj funkciuloj; raportoj al Unesko pri la progresoj de Esperanto-instruado en lernejoj, konforme al p-to IV.4.224 de la Rezolucio de Unesko de 1954; utiligo de mondaj kampanjoj (ekzemple Internacia Jaro de Edukado) por informoj kaj dokumentoj pri Esperanto en Lernejoj; instigoj aliĝi al la projekto „Asociiĝintaj Lernejoj" de Unesko, kaj aliaj agadoj. Laŭ la propono de KKL, UEA fariĝis asocia membro de FIOCES — la internacia organizaĵo por lernejaj korespondado kaj interŝanĝoj —, utiligis la organon de FIOCES por larĝigi la interlernejan korespondadon per Esperanto, kaj partoprenis en la konferenco de FIOCES en Bombajo, Hindio (decembro 1968).

KKL dediĉis apartan atenton al novaj leĝoj, dekretoj, ministeriaj cirkuleroj kaj similaj aktoj, kiuj rilatis al instruado de Esperanto en lernejoj. Pri tio ĝi regule informadis en la Lerneja Bulteno kaj,

koncize, en la Estraraj Raportoj de UEA [6].

Aliflanke, *CED* faris pliajn enketojn kaj publikigis dokumentojn pri instruado de la lingvo en lernejoj kaj universitatoj, pri la eduka valoro de Esperanto, pri la efiko de Esperanto-instruado je lernado de aliaj objektoj, pri eksperimentoj rilate la facilecon de Esperanto kompare kun aliaj lingvoj, kaj pri aliaj aspektoj, rekte aŭ nerekte konektitaj kun la traktata demando.

Paralele aktiviĝis la laboro por vastigo de Esperanto-instruado en *unuopaj landoj:*

En 1964-65 estis atingitaj pluraj sukcesoj. En *Argentino* (provinco de Santa Fé), estis prezentita leĝpropono pri la deviga instruado de Esperanto en kelkaj klasoj de elementaj kaj duagradaj lernejoj. En *Brazilo* la ekzemplon de la ŝtato Sâo Paulo sekvis la 14-an de oktobro 1964 la ŝtato Guanabara: laŭ la Leĝo n-ro 588 Esperanto fariĝis elektebla objekto en mezgradaj lernejoj de Rio de Janeiro. En *Bulgario,* laŭ la Decido n-ro 1874 de la 24-a de decembro 1964, Esperanto fariĝis studobjekto en la Filologia Fakultato de la Universitato en Sofio. En *Hispanio* estis atingita la plej granda sukceso: fondo de la unua Katedro de Esperanto en La Laguna per Dekreto de la 7-a de decembro 1963. En *Hungario* Esperanto fariĝis fakultativa studobjekto en la Fakultatoj Jura, Naturscienca kaj Filologia, ĉio laŭ la Rektora Dekreto n-ro *640/1963.* En *Italio* komenciĝis la preparado de leĝpropono pri enkonduko de Esperanto en lernejojn. En *Israelo,* laŭ la Decido de la Departemento pri Edukado de la Urbestraro de Tel Aviv-Jaffa n-ro 418/13/H de la 23-a de januaro 1964, estis ebligita la lernado de Esperanto en feriaj posttagmezaj rondoj. En *Nederlando* estis atingita rimarkinda sukceso. La 16-an de julio 1964 la Parlamento amendis la ekzistantan Leĝon pri Elementa Instruado: laŭ la nova leĝo, ĉiu estraro de du tipoj de lernejoj — daŭriga ĝenerala elementa instruado (du jaroj) kaj pli ampleksa elementa instruado (kvar jaroj) — povas enkonduki Esperanton kiel nedevigan studobjekton. Temas pri lernejoj por infanoj kaj gejunuloj en la aĝo de 12 ĝis 16 jaroj. La Parlamento samtempe modifis la Leĝon pri Pedagogiaj Seminarioj kaj establis oficialan ŝtatan diplomon pri instruado de Esperanto en elementaj lernejoj. En *Pollando,* kie jam pli frue la pozicio de Esperanto en lernejoj estis tre kontentiga, estis por la unua fojo enkondukitaj poentoj pri scio de Esperanto en diplomoj por estontaj geinstruistoj. En *Usono* estis decidite, ke 24 lernejoj en San Mateo ekinstruos Esperanton, kaj pluraj efektive komencis la instruadon. La Universitato de Kalifornio en Berkeley aranĝis specialan kurson por geinstruistoj.

6. Ili troviĝas en la *Jarlibro* de UEA, 1965—1969, en la ĉapitroj pri lernejoj.

En *1965-66* aldoniĝis novaj atingoj. En *Brazilo* kursoj de Esperanto estis enkondukitaj en 4 pliajn lernejojn. En *Britio* la situacio pliboniĝis, ĉar du regionaj instancoj decidis aranĝi ekzamenojn pri Esperanto en mezgradaj lernejoj, kio fakte okazis.

En *1966-67* la *itala* Leĝprojekto estis anoncita en la Parlamento kaj ricevis la n-ron 1816. Ekde tiam ĝi estas konata kiel Leĝprojekto 1816. En *Pollando,* en la kadro de la t.n. projekto „eksperimentado", Esperanto estis instruata devige en kelkaj lernejoj kaj nedevige en multaj.

En *1967-68* la plej granda evento okazis en *Pollando:* la Ministro pri Instruado kaj Superaj Lernejoj publikigis Dekreton, per kiu estis aprobita projekto de programo por Esperanto-instruado en ĉiuj lernejoj kiel nedeviga studobjekto.

En *1968-69,* pro ŝanĝo de la registaro en *Italio,* necesis entrepreni novajn paŝojn rilate la Leĝproponon n-ro 1816[7]. En *Aŭstrio* estis publikigita dekreto pri la eblo instrui Esperanton kaj aprobita instruplano. En la baltaj respublikoj de *USSR* Estonio, Litovio, Latvio estis publikigitaj dekretoj pri la enkonduko de Esperanto-instruado en lernejojn sub difinitaj kondiĉoj.

En la periodo *1964-1969* komenciĝis ankaŭ la agadoj sur *regionaj niveloj.* Al la plej gravaj sendube apartenas la Regionaj Kunordigaj Konferencoj por Enkonduko de Esperanto en Lernejojn, okazintaj en Maribor, Jugoslavio, kun partopreno de Aŭstrio, Hungario, Italio kaj Jugoslavio, al kiuj poste aliĝis ankaŭ Bulgario. Entute okazis 5 Kunordigaj Konferencoj por tiu ĉi regiono: la unua estis en marto 1967; la kvina, kaj lasta ĝis nun, okazis de la 31-a de marto ĝis la 2-a de aprilo 1972, ĉiam bonege organizitaj kaj apogitaj de la slovenaj edukaj aŭtoritatoj.

Kiel indikas ilia nomo, la ĉefa celo de tiuj ĉi konferencoj estas kunordigi la ekzistantan instruadon de Esperanto en la lernejoj de la 5 landoj, kaj fine atingi, ke la kompetentaj ŝtataj instancoj enkonduku samtempe la devigan instruadon de Esperanto en difinitajn lernejojn de Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio. La Konstanta Organiza Komitato (KOK) troviĝas en Maribor, kaj ĝia sekretario estis Ludoviko Prebil. Lernejaj Komisionoj (LK) funkcias en ĉiuj 5 landoj.

La aktivado en tiu ĉi regiono — nun Regiono I de ILEI, kiu estas organizanta similajn formojn de kunlaboro ankaŭ en aliaj regionoj — estas aparte signifa, ĉar la 5 ŝtatoj havas amikajn oficialajn rilatojn

7. Bedaŭrinde, malgraŭ la tre bona organizo de tiu agado kaj la granda apogo, kiun la propono ĝuis inter la deputitoj, pro la postaj ŝanĝoj en la konsisto de la Parlamento la afero ankoraŭ ne sukcesis. En 1972 la italaj iniciatintoj renovigis la agadon.

kaj en ili, aldone al pluraj aliaj lingvoj, 8 ĉefaj naciaj lingvoj estas parolataj: la itala, germana, hungara, bulgara, makedona, serba, kroata kaj slovena. Maribor, en Slovenio, prezentiĝas kiel la plej taŭga centro ne nur tial, ĉar Jugoslavio havas najbarajn limojn kun la ceteraj 4 landoj, sed ankaŭ tial, ĉar ĝi troviĝas en la mezo de tiu lingva diverseco. Krome, Slovenio ĉiam havis kaj plu havas unuarangajn organizantojn kaj klerajn laborantojn por la Internacia Lingvo. Tiu regiona kunlaboro jam donis bonajn fruktojn kaj, espereble, produktos ankoraŭ pli bonajn en la estonteco. Laŭ la Protokolo de la 5-a Kunordiga Konferenco (1972), Esperanto estas instruata, aldone al aliaj lernejoj, en 22 eksperimentaj klasoj kun 594 gelernantoj en Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio (Kroatio, Serbio kaj Slovenio), dum por Aŭstrio mankis informoj.

Fine, sed certe ne malplej grave, necesas emfazi la konsiderindan revigliĝon de *ILEI* kun la nuna, tre internacia kaj agema estraro: ĉefinstruisto R. H. M. Markarian (Britio) kiel prezidanto, D-ro M. Dazzini (Italio) sekretario, kaj Dora Andersson (Svedio) kasistino. Aparte menciinda estas ankaŭ ĝia vicprezidanto H. Sonnabend (Germanio), senlaca organizanto de internaciaj renkontiĝoj kaj seminarioj (ekzemple la Pedagogia Konferenco en Sonnenberg en 1968). ILEI ankaŭ instigas organizon de la landaj sekcioj: rezulte, en 1972 ILEI havis sekciojn en 17 landoj. En 1970 komencis aperadi *Internacia Pedagogia Revuo,* redaktata de H. Sonnabend. Ekde 1968 H. Sonnabend, kune kun R. H. M. Markarian (la lasta estis membro ekde la fondo de KKL), reprezentis ILEI en la Konsulta Komisiono pri Lernejoj. (En 1973 li fariĝis prezidanto de ILEI.)

En tiaj kondiĉoj KKL decidis okazigi la Trian Lernejan Konferencon. La prezidanto de KKL ricevis la taskon ankoraŭfoje esplori la starpunkton de diversaj registaroj koncerne la eblecon de interŝtata konvencio por laŭgrada kaj paralela enkonduko de Esperanto kiel deviga studobjekto en difinitan nombron kaj tipon de lernejoj almenaŭ en kelkaj landoj. La ampleksa laboro rekomenciĝis en 1968 kaj estis finita antaŭ la Tria Lerneja Konferenco en 1969. Projekto de Konvencio kun eblaj modifoj, apogaj dokumentoj kaj demandaroj estis ellaboritaj. La starpunkto de la registaroj estis esplorita ĉu tra rektaj kontaktoj, ĉu pere de kunlaborantoj en diversaj landoj.

La *Tria Internacia Konferenco de Lernejoj* en kiuj Esperanto estas instruata (Tria Lerneja Konferenco) okazis en Dipoli, Helsinki, Finnlando, la 3-an kaj 4-an de aŭgusto 1969. La Konferenco estis organizita de KKL en kunlaboro kun la LKK de la 54-a UK, precipe ĝia komisiito V. Setälä. Ĉeestis oficialaj registaraj reprezentantoj de 7 landoj: Belgio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Italio, Pollando kaj Svedio; reprezentantoj de 17 landaj Esperanto-asocioj: Aŭstrio,

Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Germanio (FRG), Hungario, Israelo, Jugoslavio, Kanado, Nederlando, Norvegio, Pollando, Svedio, Svislando kaj Usono; la reprezentantoj de 12 landaj sekcioj de ILEI: Aŭstralio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Francio, Germanio (FRG), Hungario, Nederlando, Pollando, Svedio, Svislando kaj Usono. La ĉefa celo de la Konferenco estis pristudi la eblecojn pri paralela enkonduko de la Internacia Lingvo en la lernejojn kaj universitatojn surbaze de *interŝtata konvencio*. La bazo de la diskutoj estis tri ĉefaj raportoj: rezultoj de la enketo pri la starpunkto de diversaj registaroj rilate la eblecojn de interŝtata konvencio (Prof. I. Lapenna); rezultoj de la enketo pri la jura pozicio de Esperantoinstruado en 28 landoj (R. H. M. Markarian); rezultoj de la lasta enketo pri la nombro de lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata (Rektoro Helmuth Sonnabend).

Rilate la ĉefan demandon la Konferenco konstatis, ke en la aktualaj internaciaj politikaj cirkonstancoj — kaj ankaŭ pro aliaj kaŭzoj — ankoraŭ ne maturiĝis la kondiĉoj por atingi internacian interkonsenton sur la plej alta nivelo de interŝtata konvencio, sed ke estas pli utile intensigi la klopodojn en unuopaj landoj kaj maksimume kunordigi la agadojn sur regiona nivelo laŭ la modelo de la Maribora Konferenco. Konsiderante tiun fakton, la ĝenerala Rezolucio de la Konferenco antaŭvidas, unuavice, la vastigon de Esperantoinstruado en unuopaj landoj, kaj nur en posta stadio la prikonsideron de interŝtata konvencio. Ĝi tekstas:

Rezolucio de la Tria Lerneja Konferenco

Aŭdinte la raportojn kaj konstatinte, ke:
(i) Konforme al la leĝoj kaj dekretoj reguligantaj la edukan sistemon, la Internacia Lingvo Esperanto estas instruata en aro da elementaj, mezgradaj kaj superaj lernejoj kaj universitatoj de 31 landoj, kaj ke
(ii) La instruado de la Internacia Lingvo ĉiam pli efike servas al edukado por internacia kompreniĝo,
La Konferenco apelacias al instancoj, respondecaj pri la instruado kaj edukado en diversaj ŝtatoj *vastigi* la instruadon de Esperanto en lernejoj, kaj *prikonsideri* subskribon de interŝtata konvencio aŭ alia interkonsento pri laŭgrada enkonduko de la instruado de la Internacia Lingvo en difinitan nombron de lernejoj paralele en pluraj ŝtatoj.

En ligo kun la fundamenta ideo de la Rezolucio, la Konferenco formulis nombron da taskoj kaj sugestoj en la Konkludoj. La plej gravaj el ili estas: intensigi la klopodojn por enkonduko de Esperanto en kiel eble plej multajn lernejojn kaj porinstruistajn seminariojn; atingi oficialigon de studprogramoj por Esperanto; certigi adekvatajn ekzamenojn por Esperanto sur la sama nivelo kiel por aliaj stud-

objektoj; atingi, ke la edukaj instancoj oficiale agnosku diplomojn, por tiuj, kiuj deziras instrui Esperanton kaj posedas la ceterajn kvalifikojn por instruado en lernejoj; pligrandigi la reton de Esperanto-instruantaj lernejoj, kiuj partoprenas en la projekto de Unesko „Asociiĝintaj Lernejoj"; intensigi la klopodojn en diversaj landoj por atingi eksplicitan juran rajton instrui Esperanton en la lernejoj.

Per tio la Konsulta Komisiono pri Lernejoj kompletigis la taskojn, kiujn ĝi prenis sur sin en 1964. Intertempe, kiel montrite, ILEI tiom fortikiĝis, ke ĝi mem sentis sin sufiĉe forta por plue daŭre prizorgi kaj evoluigi la laborojn, pri kiuj okupiĝis KKL. Sekve, laŭ la propono de ILEI, la Estraro de UEA, kun la aprobo de la Komitato, malfondis KKL en 1970.

La ĉefaj konkretaj rezultoj de tiu tuta ampleksa postmilita agado estas prezentitaj en plej konciza formo en la sekvantaj sekcioj de tiu ĉi ĉapitro.

4.6.2 Juraj Eblecoj por Instruado de Esperanto en Diversaj Landoj

En 1968-69 CED entreprenis enketon (komisiito R. Markarian) por eltrovi la jurajn eblecojn instrui la Internacian Lingvon en diversaj landoj. La celo estis ne nur ekscii la pozicion de Esperanto en kiel eble plej multaj naciaj edukaj sistemoj, sed ankaŭ havigi dokumentan materialon por apogi proponojn pri enkonduko de Esperanto-instruado en lernejojn de tiuj landoj, en kiuj tiaj eblecoj ankoraŭ ne ekzistas.

La suba trarigardo estas farita ĉefe surbaze de la dokumento de CED B/IV/14 de la 28-a de junio 1969, sed kun kelkaj kompletigoj. Kvankam la informoj rilatas nur al 27 landoj, ĝi tamen donas klaran bildon pri la diversaj eblecoj instrui la lingvon en lernejoj. Samtempe ĝi indikas la vojon, laŭ kiu oni povas klopodi enkonduki ĝian instruadon en tiuj landoj, kie ĝi ankoraŭ ne estas instruata.

Jen la situacio en ĉiu el la 27 landoj, pri kiuj estis eble havigi informojn:

Aŭstralio: Ekzistas neniu jura preskribo por aŭ kontraŭ la instruado de Esperanto en la lernejoj. Lernejestroj mem rajtas decidi ĉu instrui ĝin aŭ ne.

Aŭstrio: Per Dekreto 102 de la Federacia Ministerio por Intruado de la 23-a de februaro 1968, oni donis al Esperanto la pozicion de fakultativa instruobjekto kun po du lecionoj semajne. Laŭ la instruplano oni povas instrui Esperanton en la 3-a kaj 4-a klasoj de ĉeflernejoj (12-14-jaraj infanoj).

Per Dekreto de la sama Ministerio de la 28-a de aŭgusto 1946, Bl 5058-IV/8/1946, estis starigita en Vieno (kaj poste ankaŭ en Innsbruck kaj Salzburg) Ŝtata Ekzamen-Komisiono pri Esperanto. La oficiala ekzamenregulo estis publikigita en la Bulteno de la Instruministerio *Verordnungsblatt des Bundesministeriums für Unterricht, Stück 10 v. 1/10/46.*

Belgio: En 1963 la Instruministerio, en respondo al Senatano Vandermeulen diris, ke la instruado de Esperanto inter „kromaj kursoj" ne estas malpermesita. Tio signifas, ke lernejestro rajtas enkonduki la lingvon laŭ sia propra iniciato.

La 30-an de majo 1968, D-ro P. Denoël kaj s-ro G. Vanbreuse estis akceptitaj en la Instruministerio. Tie alta funkciulo diris al ili, ke iu normala aŭ perfektiga lernejo, malfermante kurson de Esperanto-instruado por estontaj instruistoj, povas peti de la ministro la agnoskon de tiu kurso kaj de la diplomo disdonota post celkonforma ekzamenado. Oni aldonis, ke tiu konsentita agnokso povos esti konsiderata kiel ĝenerala oficialigo, valora por aliaj similaj lernejoj. En 1968, la unua kurso malfermiĝis en la Lieĝa Supera Pedagogia Lernejo.

Brazilo: La 11-an de oktobro 1968 la Departemento pri Unuagrada kaj Mezgrada Instruado komunikis, ke la Federacia Konsilantaro pri Edukado rekonas la valoron de instruado de Esperanto kaj permesas enkondukon de la lingvo en mezgradajn lernejojn kiel nedeviga objekto, sed, konforme al la validaj leĝoj kaj konsiderante la malsamajn kondiĉojn en diversaj ŝtatoj, lasas tiurilate la iniciaton al la interesitoj.

Britio: La Edukministro deklaris en 1949, ke la Ministro estas nek por nek kontraŭ la instruado de Esperanto. Lernejestroj rajtas decidi ĉu enkonduki Esperanton aŭ ne. Tion konfirmis letero de la Edukministerio de la 30-a de marto 1949, subskribita de la Parlamenta Sekretario D. R. Hardman.

Ekde 1965 ekzistas ŝtata ekzameno pri Esperanto, en la kadro de *Certificate of Secondary Education* (atestilo pri duagrada edukiĝo), por lernejanoj kiuj studis dum minimume kvin jaroj en iu ajn duagrada lernejo. Esperanto povas esti instruata devige, dum lernejaj horoj.

Bulgario: Esperanto-instruistoj ricevas ĉiun helpon kaj subtenon de la registaro, kaj la lingvo estas instruebla kiel fakultativa temo. Ekzistas oficiala studprogramo.

Ĉeŭoslovakio: La instruado de Esperanto ne estas malpermesita

kaj en kelkaj lernejoj ĝi okazas en „libervolaj interesrondoj" kaj eĉ en la oficialaj atestoj povas esti mencio pri ĝia lernado.

Finnlando: Esperanto povas esti instruata fakultative ekster la oficialaj horoj.

Francio: En dokumento de la 11-a de oktobro 1938, la tiamaj Direktoroj pri Teknika kaj Duagrada Edukado rekomendis al la Rektoroj de la diversaj „Akademioj" tra Francio subteni la disvastigon de Esperanto-instruado. Ili aparte menciis la eblecojn por instruado de Esperanto dum la t.n. „direktitaj agadoj" ekster la oficiala lerneja horaro.

Germanio (FRG): La nunan situacion difinas la decido de la Ministroj pri Kulturaj Aferoj de ĉiuj Landoj (*Länder*) de la 4-a/5-a de novembro 1954, reviziita la 28-an/29-an de septembro 1961: „La enkonduko kiel deviga objekto estas malakceptita; la instruadon de Esperanto en libervolaj studgrupoj nenio malhelpas."

Hindio: Estas neniu preskribo por aŭ kontraŭ la instruado de Esperanto.

Hispanio: Esperanto povas esti instruata dum „kromaj horoj" laŭ la elekto de la lernanto.

Hungario: Esperanto povas esti instruata laŭ Dekreto 25386/1963 (Kleriga Bulteno, Jaro VII, n-ro 19, la 1-an de oktobro 1963, paĝo 430. „La instruado de lingvo Esperanto en ĝeneralaj kaj mezaj lernejoj".) Oni rajtas instrui Esperanton en la kadro de la oficiala horaro en ĝeneralaj lernejoj (klasoj 5-8), kondiĉe ke la instruisto finis la kursojn de Hungara Esperanto-Asocio por lingvo-instruado. En mezlernejoj Esperanto povas esti instruata kiel fremda lingvo, nedevige, laŭ la Ministeriaj Instrukcioj, n-ro 69/1957/M.K.12/M.M.

Israelo: Dum 1967 kaj 1968 oni komencis instrui Esperanton en du mezgradaj lernejoj en Natanja kun permeso de lernejestroj kaj la Edukministro. En 1967 la Edukministro eldonis tri mil ekzemplerojn de broŝuro pri la instruado de Esperanto en mezgradaj lernejoj. Sekve, okazis en multaj lernejoj prelegoj pri Esperanto, en la kadro de socia edukado. Ekzistas Esperanto-ekzamenoj kiel por aliaj temoj kaj la instruistoj estas pagataj por la Esperanto-instruado.

Italio: Cirk. Let. Prot. N. 12411 de la 11-a de februaro 1951 de la Ministro de Publika Instruado informis ĉiujn *Provveditori agli Studi,* t.e. la oficialulojn ŝarĝitajn en ĉiuj provincoj pri kontrolado de

la unuagradaj kaj mezgradaj lernejoj, ke la instruado de Esperanto devas esti favorata almenaŭ en tiuj centroj, kie jam troviĝas kvalifikitaj instruistoj. Sekve, oni rajtas instrui Esperanton kiel elekteblan studobjekton kun permeso de la lernejestro, dum kromaj horoj. La instruistoj ne ricevas pagon.

La Leĝpropono n-ro 1816 estis denove prezentita al la Parlamento la 23-an de majo 1969 kaj ricevis la novan numeron 1489. Ĝi celas la fakultativan instruadon de Esperanto al 9-10jaraj gelernantoj dum lernejaj horoj: se elektita kiel lernobjekto, Esperanto fariĝas deviga dum tri jaroj, post kio ĝi ricevas mencion en la lerneja diplomo. Kiel menciite, la projekto ankoraŭ ne fariĝis leĝo. Pro diversaj kaŭzoj estis necese renovigi la agadon en 1972.

Japanio: En gvidlibroj por instruistoj de mezgradaj lernejoj (11-19jaraj lernantoj) estas klare menciite, ke oni rajtas oficiale instrui Esperanton se la instruisto havas diplomon. La temo estas unue fakultativa, sed post la elekto fariĝas deviga; kaj la instruado okazas ne en la kadro de lingvo-instruado, sed en tiu de sociaj studoj.

En la Manifesto de la Japana Socialista Partio troviĝas punkto, kiu celas, post eventuala enoficiĝo, la devigan enkondukon de Esperanto kiel unua lingvo en ĉiujn elementajn lernejojn.

Jugoslavio: Laŭ letero n-ro 61-10/65-1 de la 18-a de marto 1965, la Ĉefo de la Kabineto ĉe la Federacia Sekretariato por Klerigo kaj Kulturo informis Jugoslavian Esperanto-Ligon, ke aparta permeso por la instruado de Esperanto ne necesas, ĉar ĝi jam estas inkluzivita inter la aliaj lingvoj, kiuj povas esti fakultative instruataj en Jugoslavio.

Kanado: Ĉiu provinco respondecas pri siaj propraj edukaj aranĝoj. Estas neniu leĝo por aŭ kontraŭ la instruado de Esperanto, sed nuntempe Esperanto estas instruata ĉefe kiel klubagado post lernejaj horoj.

Kolombio: Oni rajtas instrui Esperanton, sed nur sub la kondiĉo, ke tiu instruado ne kontraŭas la ŝtatan sekurecon, publikan moralon aŭ ordon. Se instruata, ĝi estas fakultativa temo.

Madagaskaro: Esperanto povas esti instruata kondiĉe, ke la instruisto posedas aŭ (i) Ateston pri Kapableco de la Franca Esperanto-Instituto (antaŭ la 9-a de februaro 1968), aŭ (ii) la korespondan diplomon de la Malgaŝa Esperanto-Instituto mem.

Nederlando: Esperanto estis enkondukita en la daŭrigajn elementajn kaj la duagradajn lernejojn laŭ Reĝa Decido de la 16-a

de julio 1964, kiu estis publikigita en la Oficiala Gazeto de la 13-a de aŭgusto 1964, n-ro 307.

Laŭ Reĝa Decido de la 23-a de decembro 1964, publikigita en la Oficiala Gazeto de la 14-a de januaro 1965, n-ro 574, estis enkondukita la ŝtata diplomo L.O. Diplomo pri Esperanto, kiu estas akirebla nur por profesiaj instruistoj. Ili ricevas pagon por la Esperanto-instruado. La leĝo pri la prepara scienca instruado ebligis, ekde la 1-a de aŭgusto 1968, la elekton de Esperanto kiel fakultativa studobjekto en diversaj mezgradaj lernejoj.

Novzelando: Ne ekzistas preskribo por aŭ kontraŭ la instruado de Esperanto, kvankam la Eduka Akto listigas diversajn studobjektojn, kiuj estas devigaj. Esperanto ne estas menciita, sed lernejestro rajtas utiligi proksimume kvin horojn semajne laŭ sia bontrovo; kaj la instruado de Esperanto estas permesita en la kadro de tiuj horoj kaj tiu bontrovo, t.e. kiel fakultativa studobjekto.

Rilate al elementaj lernejoj, oficiala gvidlibro pri la instruado de la angla lingvo sciigas, ke oni rajtas etendi la lingvo-sciojn de la infanoj per la instruado de lingvoj, i.a. ankaŭ Esperanto.

Pollando: Dokumento, publikigita la 1-an de decembro 1967, detale klarigas la studprogramon por la instruado de Esperanto en la unuaj tri jaroj de la lernado en elementaj kaj mezaj lernejoj. La lingvo estas oficiale instruebla, nedevige, en la kadro de eksterlecionaj studoj. Instruistoj povas ricevi oficialan rajtigilon por la instruado de Esperanto.

Sudafriko: Estas neniu preskribo por aŭ kontraŭ la instruado de Esperanto.

Svislando: Estas neniu preskribo por aŭ kontraŭ la instruado de Esperanto; la kantonoj mem rajtas decidi pri tio.

USSR: Kun la permeso de la edukaj aŭtoritatoj oni rajtas instrui Esperanton fakultative dum kromaj horoj.

Aparta situacio ekzistas en tri SSR. Ekde septembro 1969 la Ministerio pri Klerigo de Estona SSR permesas la instruadon de Esperanto en la 8-a klaso de la lernejoj, kondiĉe ke troviĝu kompetenta instruisto kaj ke minimume 15 gelernantoj elektu la kurson. En Litova SSR, laŭ Decido de aprilo 1969, estas eble instrui Esperanton en mezgradaj lernejoj. En la komenco estis 19 lernejoj, en kiujn estis enkondukitaj kursoj de Esperanto. La nova decido estis anoncita per 40-paĝa oficiala broŝuro de la Edukministerio de Litova SSR, en 3.000 ekzempleroj *(Užsienio kalbu ir Esperanto kalbos fakultatyviniu užsiemimu: Programos. Kaunas: Šviesa, 1968).*

Laŭ la nova programo Esperanton povas lerni la klasoj 7-a ĝis 11-a kaj la objekto estas fakultativa. La oficiala studprogramo antaŭvidas instruadon de 1½ horoj semajne. La dokumento atentigas, ke la Internacia Lingvo estas „la plej rapide lernebla el ĉiuj lingvoj de la mondo", kaj ke ĝi donas bazon por la posta lernado de aliaj lingvoj. Laste, ankaŭ la Ministerio pri Edukado de Latva SSR eldonis instruprogramon de Esperanto, devigan por ĉiuj lernejoj, kie troviĝas instrukapablaj konantoj de la lingvo kaj interesiĝantoj por lernado. Unuiĝo de Instruistoj organizis la unuajn oficialajn kursojn de Esperanto, ne nur por instruistoj, sed ankaŭ por aliaj personoj. La instruistoj ricevas salajron.

Usono: Estas neniu leĝo por aŭ kontraŭ la instruado de Esperanto. La lernejestro, kutime kun la aprobo de la lerneja konsilantaro (lokaj civitanoj), povas fari decidon pri la enkonduko de Esperanto.

4.6.3 Lernejoj kun Esperanto kiel Studobjekto

Post la Dua Mondmilito, ok fojojn estis faritaj enketoj pri la stato de Esperanto en lernejoj de ĉiuj gradoj kaj specoj: elementaj, duagradaj, porinstruistaj, komercaj, metiaj aŭ similaj. En kelkaj el la enketoj estis inkluzivitaj ankaŭ universitatoj, dum en aliaj kazoj estis faritaj apartaj enketoj pri la stato en universitatoj kaj samrangaj lernejoj. En la subaj informoj estas donitaj kompletaj ciferoj pri ĉiuj lernejoj, unuavice kaj ĉefe laŭ la rezultoj de la enketoj. Necesas atentigi, ke en la norda hemisfero la lerneja jaro daŭras proksimume de septembro ĝis junio. Tial estas uzita la esprimo „dum la lerneja periodo 1946-47" aŭ simile por la ceteraj lernejaj jaroj. Sed en aliaj partoj de la mondo la lerneja jaro komenciĝas kaj finiĝas en aliaj monatoj. Tial, la rezultoj de la enketoj rilatas aŭ precize al la lerneja jaro kiel indikite, aŭ al unu el la du kalendaraj jaroj: la antaŭe menciita, aŭ la posta. Esence, tio ne ŝanĝas la aferon, ĉar la celo ja estas doni superrigardon pri Esperanto kiel studobjekto en lernejoj en difinitaj periodoj kun iom da interspacoj.

Ĉi tie estas donitaj nur la landoj, en kies lernejoj Esperanto estis instruata en difinita lerneja jaro, la nombro de lernejoj por ĉiu unuopa lando, kaj la nombro de ĉiuj gelernantoj. La du ciferoj post la nomo de la lando indikas la nombron de lernejoj kaj la nombron de gelernantoj, kiuj lernis Esperanton. Ekzemple: „Britio 15/1160" signifas, ke Esperanto estis instruata en 15 britaj lernejoj kaj ke la nombro de ĉiuj gelernantoj estis 1.160. En la statistikaj trarigardoj, precipe en tiuj faritaj de CED ekde la lerneja jaro 1955-56, troviĝas nombro da aliaj precizaj informoj: nomo de la

lernejo; tipo: unuagrada, duagrada, universitato kaj samranga lernejo; ĉu la lernejo estas nur por knaboj, nur por knabinoj, aŭ miksita kaj la preciza nombro de ĉiuj gelernantoj en ĉiu el la menciitaj kategorioj; kondiĉoj por instruado de Esperanto, precipe ĉu oficiala aŭ neoficiala, deviga aŭ nedeviga, en la instruprogramo aŭ ekster ĝi; longeco de la kursoj (nombro de jaroj); nomo de la instruisto kaj adreso de la lernejo.

Jen, do resumaj informoj, bazitaj ĉefe sur la publikigitaj dokumentoj:

En la lerneja jaro 1946-47 Esperanto estis instruata en jenaj landoj: Belgio 2/23, Britio 15/1160, Bulgario 1/30, Ĉeĥoslovakio 6/210, Danlando 2/75, Finnlando 2/50, Francio 12/244, Greklando 12/1111, Hungario 4/111, Italio 1/25, Nederlando 5/92, Norvegio 2/42, Novzelando 1/10, Pollando 5/130, Svedio 3/286, Usono 2/4. Entute do Esperanto estis instruata en 75 lernejoj en 16 landoj al 3.603 gelernantoj. La statistika trarigardo estis publikigita en la *Jarlibro de UEA, Dua Parto,* 1947.

En la lerneja jaro 1950-51 la situacio estis: Aŭstrio 7/185, Brazilo 1/150, Britio 22/1539, Bulgario 1/12, Ĉeĥoslovakio 8/147, Danlando 2/11, Finnlando 2/102, Francio 28/408, Germanio 23/558, Greklando 13/1613, Hungario 1/25, Italio 2/120, Jugoslavio 2/60, Nederlando 11/273, Norvegio 1/12, Pollando 1/49, Svedio 3/49. Entute, do Esperanto estis instruata en 128 lernejoj de 17 landoj al 5.313 gelernantoj. Same kiel en la antaŭa periodo, ankaŭ en tiu ĉi Greklando estis la plej forta. Kelkaj landoj aperis en la listo, dum aliaj malaperis. La statistiko estis publikigita en la *Jarlibro de UEA, Dua Parto,* 1951.

En 1954 estis farita urĝa enketo nur pri la nombro de lernejoj kun Esperanto kiel studobjekto en diversaj landoj, sed ne pri la nombro de gelernantoj kaj aliaj detaloj. Tiun enketon entreprenis CED por havigi la plej lastajn informojn pri la stato de Esperanto en lernejoj, tuj antaŭ la Ĝenerala Konferenco de Unesko, okazonta en novembro-decembro 1954 en Montevideo. La rezulto de tiu enketo estis: Aŭstrio 7, Brazilo 1, Britio 21, Danlando 1, Finnlando 1, Francio 28, Germanio 23, Greklando 3, Hungario 1, Italio 2, Jugoslavio 36, Nederlando 11, Norvegio 1, Svedio 3, Usono 19, do entute 158 lernejoj en 15 landoj. Estas rimarkinde, ke en tiu ĉi jaro Jugoslavio havis la plej grandan nombron da lernejoj, dum Britio, Francio kaj Germanio solide konservis la poziciojn.

En la lerneja jaro 1955-56 la situacio prezentiĝis jene: Aŭstrio 3/35, Belgio 1/25, Britio 17/806, Ĉeĥoslovakio 2/47, Danlando 1/21,



Novzelanda klaso: En la lerneja jaro 1968-69, en 543 lernejoj de 31 landoj oni instruis la Internacian Lingvon al 16.505 gelernantoj.

Finnlando 3/71, Francio 17/230, Germanio (FRG) 9/237, Hispanio 2/30, Hungario 1/15, Italio 9/314, Japanio 3/219, Jugoslavio 53/1813, Kanado 1/12, Maroko 1/30, Meksikio 1/19, Nederlando 10/219, Novzelando 1/10, Norvegio 3/53, Svislando 3/65, Usono 2/58. En tiu ĉi lerneja jaro aperas Japanio, Maroko kaj Meksikio; Jugoslavio faris plian rimarkindan progreson. Entute, do, estis 143 lernejoj kun 4.329 gelernantoj en 21 landoj.

En la lerneja jaro 1959-60 la situacio konsiderinde pliboniĝis: Aŭstralio 1/80, Aŭstrio 2/70, Belgio 1/10, Brazilo 6/330, Britio 20/883, Bulgario 1/70, Ĉeĥoslovakio 1/20, Danlando 5/144, Finnlando 4/128, Francio 43/1277, Germanio (FRG) 9/511, Germanio (GDR) 1/15, Greklando 11/2200, Hispanio 2/21, Hungario 8/199, Italio 19/588, Japanio 4/146, Jugoslavio 171/5429, Nederlando 7/134, Norvegio 5/?, Novzelando 4/120, Pollando 9/382, Soveta Unio 2/41, Svedio 1/10, Svislando 4/95, Urugvajo 2/23, Usono 3/111. La plej rimarkindaj progresoj estis faritaj en Francio kaj Jugoslavio. Por la unua fojo aperas Soveta Unio kaj Urugvajo. Entute estis 346 lernejoj kun 13.037 gelernantoj en 27 landoj.

En la lerneja jaro 1962-63 la stato estis: Argentino 3/192, Aŭstrio 8/141, Aŭstralio 3/74, Belgio 5/110, Brazilo 6/429, Britio 28/1361, Bulgario 46/1479, Ĉeĥoslovakio 4/60, Danlando 17/308, Finnlando 6/229, Francio 71/1516, Germanio (FRG) 14/222, Germanio (GDR) 1/19, Greklando 11/692, Hispanio 6/107. Hungario 39/867, Irlando 1/31, Italio 23/1089, Japanio 26/428, Jugoslavio 139/3021, Kanado 2/21, Nederlando 7/64, Norvegio 1/10, Novzelando 3/85, Pollando 77/3350, Portoriko 1/44, Rumanio 1/10, Soveta Unio 2/25, Svislando 1/10, Svedio 2/24, Urugvajo 1/5, Usono 8/249, aŭ entute 563 lernejoj kun 16.272 gelernantoj en 32 landoj. Denove aperis kelkaj novaj landoj. La plej rimarkindaj progresoj estis faritaj en Bulgario, Hungario, Jugoslavio kaj Pollando.

En la lerneja jaro 1965-66 Esperanto estis lerneja studobjekto en: Argentino 4/83, Aŭstralio 4/314, Aŭstrio 3/31, Belgio 6/183, Bermudo 1/?, Brazilo 7/482, Britio 33/1554, Bulgario 87/4200, Cejlono 1/?, Ĉeĥoslovakio 8/79, Ĉinio 3/59, Danlando 4/60, Finnlando 6/137, Francio 63/1316, Germanio (FRG) 13/135, Gronlando 1/12, Hindio 1/20, Hispanio 3/63, Hungario 27/583, Israelo 4/40, Italio 18/485, Japanio 10/212, Jugoslavio 14/452, Kanado 1/25, Koreo 1/360, Meksikio 1/200, Nederlando 12/322, Norvegio 1/20, Novzelando 5/1301, Pollando 57/3071, Rumanio 1/?, Soveta Unio 1/100, Svedio 4/48, Svislando 1/7, Urugvajo 1/?, Usono 19/348, Vjetnamo 1/?, entute 427 lernejoj kun 16.302 gelernantoj en 37 landoj. Necesas

atentigi, ke, kompreneble, neniu statistiko estis absolute kompleta, ĉar okazis, ke lernejoj ne respondis al demandaroj, aŭ faris tion tro malfrue, aŭ ellasis la nombron de gelernantoj, sed en tiu ĉi lerneja jaro la nombro de ellasoj estis pli alta ol en la antaŭaj enketoj. Tio aparte koncernas Jugoslavion, el kiu venis informoj nur pri 14 lernejoj. En la trarigardo aperas pluraj novaj landoj, el kiuj aparte menciindaj estas Bermudo, Cejlono, Ĉinio, Gronlando, Hindio kaj Koreo. Tiun ĉi enketon faris CED en kunlaboro kun ILEI. Konsiderante la menciitajn mankojn kaj ellasojn, CED publikigis Dok. B/IV/12 en formo de nur provizora statistiko.

STATISTIKA TRARIGARDO

Lerneja jaro	Nombro de			Ĉefa fonto kaj ev. rimarkoj
	landoj	lernejoj	gelernantoj	
1946-47	16	75	3.603	Jarlibro, II, 1947; V. Nixon
1950-51	17	130	5.313	Jarlibro, II, 1951; ILEI (V. Nixon)
1953	16	160	—	Arkivo de CED; enketo farita de D. Kennedy
1955-56	21	143	4.329	Dok. de CED B/IV/4; D. Kennedy
1959-60	27	346	13.137	CED:B/IV/8; D. Kennedy kun la helpo de M. Kennedy
1962-63	32	563	16.272	CED:B/IV/9; D. Kennedy kun la helpo de M. Kennedy
1965-66	37	427	16.302	CED:B/IV/12; Olle Olson kiel komisiito de CED kaj ILEI; nekompleta
1968-69	31	543	16.505	CED:B/IV/15; H. Sonnabend kiel komisiito de CED kaj ILEI kun la helpo de K.Ruff

En la lerneja jaro 1968-69 la lerneja situacio prezentiĝis jene: Argentino 5/167, Aŭstralio 1/25, Aŭstrio 3/57, Belgio 5/88, Brazilo 7/356, Britio 25/1815, Bulgario 75/2439, Ĉeĥoslovakio 23/330, Danlando 8/84, Finnlando 3/63, Francio 43/612, Germanio (FRG) 9/143, Gronlando 1/20, Hindio 1/42, Hispanio 3/84, Hungario 96/1937, Irlando 1/12, Israelo 4/76, Italio 23/974, Japanio 38/515, Jugoslavio 35/926, Kanado 1/34, Koreo 11/388, Nederlando 8/172, Novzelando 25/1318, Pollando 56/3300, Rumanio 1/15, Soveta Unio 4/110, Svedio 2/22, Svislando 3/17, Usono 23/364. Entute, do, Esperanto estis instruata en 543 lernejoj kun 16.505 gelernantoj en 31 landoj. Rimarkindaj estas la progresoj en Bulgario, Hungario kaj la tre firma pozicio de Pollando, dum aliflanke Jugoslavio, kvankam plu relative forta, tamen ĉesigis la instruadon de Esperanto en sufiĉe granda nombro da lernejoj.

Ĉiuj supraj ciferoj pri la nombro de landoj, lernejoj kaj gelernantoj, kiel ankaŭ la pli detalaj en la fontaj dokumentoj, estas minimumaj, ĉar (i) en kelkaj kazoj estis absolute maleble ricevi informojn el tiu aŭ alia lando; (ii) en aliaj kazoj mankis iuj informoj, ekzemple pri la nombro de gelernantoj en iu lernejo, kvankam la lernejo mem estis indikita; (iii) okazis ankaŭ, ke la respondecaj geinstruistoj ne reagis je la petoj kaj ne resendis la plenigitajn demandarojn, eĉ kiam forestis eksteraj malhelpoj por fari tion. En ĉiu okazo, la nombro de lernejoj kaj gelernantoj estis — laŭ fidindaj fontoj — pli altaj, sed, pro manko de pruvaj dokumentoj, CED limigis sin nur al materialoj havigitaj pere de la menciitaj enketoj kaj subskribitaj de respondecaj enketitoj.

4.6.4 Universitatoj

Aldone al la ĝeneralaj enketoj pri instruado de Esperanto en la lernejoj, la Centro pri Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo aparte okupiĝis ankaŭ pri la Internacia Lingvo kiel studobjekto en universitatoj kaj samrangaj altlernejoj en diversaj landoj.

La unua enketo estis farita en 1953 kaj la rezultoj publikigitaj en Dok. B/V/1. Alia enketo estis entreprenita en 1955 kaj la rezultoj aperis en Dok. B/V/2. La lasta enketo okazis en 1969-70. La ĉefaj rezultoj troviĝas en la suba trarigardo. En ĝi estas menciitaj, laŭvice, jenaj informoj pri ĉiu lando kaj urbo: 1. Nomo de la universitato aŭ samgrada institucio; 2. Jaro de fondiĝo, se konata; 3. Katedro aŭ lektorato; 4. Deviga aŭ nedeviga objekto (ev. ekzamena objekto).

Montriĝas, ke fakte ekzistas nur unu katedro de la Internacia

Lingvo (Esperanto), nome en La Laguna, Tenerife, Hispanio (Prof. Juan Régulo-Pérez), dum en ĉiuj aliaj kazoj temas pri „lektoratoj". Pro la grandaj diferencoj inter la sistemoj de supera edukado en diversaj landoj — kaj same granda malsameco de universitataj titoloj — la esprimo „lektorato" estas uzita en la plej ĝenerala senco de la vorto, nome kiel objekto en oficiala universitata instruprogramo (ne sporada kurso), tute egale ĉu temas pri Esperanto kiel sendependa studobjekto en lingvoscienca fakultato (aŭ egalgrada institucio), aŭ nur pri aldona objekto en la kadro de alispeca fakultato, ekzemple jura, naturscienca, filozofia ktp. Cetere, en kelkaj landoj „filozofia fakultato" estas ofte fakultato, kiu instruas ne nur filozofion, sed ankaŭ lingvosciencon kaj unuopajn lingvojn.

Kun tiuj rezervoj kaj atentigoj, la situacio prezentiĝas jene:

Aŭstrio

1. Innsbruck: 1. Instituto de Kompara Lingvistiko, Filozofia Fakultato, Leopold-Franzens-Universität; 2. 1948; 3. lektorato; 4. nedeviga.

2. Wien: 1. Hochschule für Bodenkultur; 2. 1946; 3. lektorato, 4. nedeviga.

Britio

3. Liverpool: 1. Filozofia Fakultato de la Universitato; 2. 1931; 3. lektorato; 4. nedeviga.


4. Southampton: 1. School of Navigation, Universitato; 2. nekonata; 3. neoficiala; 4. nedeviga.

Bulgario

5. Sofio: 1. Fakultato de Slava Filologio de la Sofia Universitato; 2. 1924; 3. lektorato ĉe la katedro de Ĝenerala Lingvistiko; 4. nedeviga, sed ekzamena por tiuj, kiuj tion deziras.

6. Sviŝtov: 1. Fakultato, Instituto por Altaj Ekonomiaj kaj Financaj Studoj; 2. 1962; 3. lektorato; 4. nedeviga, sed ekzamena.

7. Varna: 1. Supera Instituto por Nacia Ekonomio „Dimitâr Blagoev"; instruata en du fakultatoj: (i) Komerca kaj Varscienca Fakultato kaj (ii) Fakultato pri Librotenado; 2. 1962; 3. katedro pri fremdaj lingvoj (rim.: en la kadro de la katedro estas instruataj la angla, germana, Esperanto, franca kaj rusa); 4. nedeviga.



Sciencuniversitato de Budapeŝto: Prof. d-ro István Szerdahelyi lekcias en la kadro de la Katedro de Ĝenerala Lingvistiko kaj Fonetiko.

Ĉeñoslovakio

8. Praha: 1. Husova Fakultato Praha, Dejvice; 2. nekonata; 3. lektorato; 4. nedeviga.

Finnlando

9. Helsinki: 1. Helsingin Yliopisto (Universitato de Helsinki); 2. 1967; 3. lingvoinstruo (instruas „lingvoinstruisto", kiu ne havas la titolon de lektoro aŭ pli altan) por studentoj de ĉiuj fakultatoj; 4. nedeviga.

Francio

10. Aix-en-Provence: 1. Faculté des Lettres et Sciences Humaines de la Universitato; 2. nekonata; 3. lektorato; 4. nedeviga.

Germanio (FRG)

11. Hamburg: 1. Universitato de Hamburg; 2. 1950, renovigita en 1954; 3. komisio de la lektoro por ĉiuj studentoj; 4. nedeviga.

12. Saarbrücken: 1. Universität des Saarlandes, Filozofia Fakultato; 2. 1968; 3. instrukomisio (Lehrauftrag) same kiel en Hamburg; 4. nedeviga sed eblas atestoj egalvaloraj al semestraj ekzamenoj.

Hispanio

13. La Laguna (Tenerife): 1. Instituto pri Lingvoj de Universidad de La Laguna; 2. 1963; 3. katedro; 4. deviga kaj ekzamena objekto por la enskribitoj.

Hungario

14. Budapest: 1. Sciencuniversitato, Filozofia Fakultato; 2. nemenciita; 3. lektorato en la kadro de la katedro pri Ĝenerala Lingvistiko kaj Fonetiko; 4. deviga kiel tria fako, ŝtatekzamena objekto.

15. Esztergom: 1. Instruista Akademio; 2. 1967; 3. lektorato de fremdaj lingvoj; 4. nedeviga, sed ekzamena objekto por la enskribitoj.

16. Pécs: 1. Pedagogia Altlernejo; 2. 1967; 3. lektorato de fremdaj lingvoj; 4. nedeviga, sed ekzamena objekto por la enskribitoj.

Italio

17. Caltagirone: 1. Supera Lernejo por Sociaj Asistantoj kun rango de Fakultato; 2. nekonata; 3. lektorato; 4. deviga kaj ekzamena objekto.

18. Catania: 1. Supera Lernejo por Sociaj Asistantoj kun rango de Fakultato; 2. nekonata; 3. lektorato; 4. deviga kaj ekzamena objekto.

Japanio

19. Takamatu: 1. Meizen Tanki Daigaku (Universitato); 2. nekonata; 3. nekonata; 4. nekonata.

20. Takamatu: 1. Kagawa Daigaku (Universitato); 2. nekonata; 3. nekonata; 4. nekonata.

Jugoslavio

21. Zagreb: 1. Fakultet Ekonomskih Nauka (Fakultato de Ekonomikaj Sciencoj), Universitato de Zagreb; 2. 1925; 3. lektorato; 4. nedeviga.

Koreo

22. Taegu: 1. Yeungnam Universitato; 2. 1951; 3. lektorato; 4. nedeviga.

23. Taegu: 1. Kyongbuk Universitato; 2. nekonata; 3. lektorato; 4. nedeviga.

24. Taegu: 1. Pedagogia Kolegio; 2. nekonata; 3. nekonata; 4. nekonata.

Nederlando

25. Amsterdam: 1. Universiteit van Amsterdam (Universitato de Amsterdam), Filologia Fakultato; 2. rekonfirmita en januaro 1969; 3. privatdocenteco; 4. nedeviga.

Pollando

26. Kraków: 1. Filologia Fakultato de Uniwersytet Jagielloński; 2. 1946; 3. lektorato; 4. nedeviga, sed ekzamena objekto.

27. Kraków: 1. Supera Pedagogia Altlernejo, Filologia Fakultato; 2. 1958; 3. lektorato; 4. nedeviga, sed ekzamena objekto.

28. Szczecin: 1. Agrikultura Altlernejo; 2-4 nekonataj.

29. Toruń: 1. Universitato de N. Kopernik; 2-4 nekonataj.

Usono

30. Elizabethtown: Elizabethtown College (Kolegio), Departemento de Lingvoj; 2. 1951; 3. lektorato; 4. nedeviga.

Entute, do, ekzistas unu katedro kaj 29 lektoratoj en 16 landoj. Laŭ la statistiko de 1953, ekzistis 20 lektoratoj en 8 landoj, sed eĉ ne unu katedro.

Kompreneble, en sufiĉe multaj universitatoj estas plu faritaj kursoj de Esperanto, sed tia instruado, kvankam tre grava, ne troviĝas en la universitataj programoj. Aparte menciindaj estas la kursoj en kelkaj usonaj universitatoj en 1971 kaj 1972. Ilia nombro multiĝas kaj oni povas atendi, ke baldaŭ formiĝos lektoratoj aŭ similaj gradoj kun konstanta karaktero almenaŭ en kelkaj el ili, ekzemple en Fort Lauderdale (Florido), en Carbondale (Suda Illinois), Berkeley (Kalifornio).

4.6.5 Konkludaj Rimarkoj

Kelkaj konkludoj altrudiĝas.

La unua estas, ke granda laboro jam estas farita ankaŭ sur tiu ĉi kampo, ofte kun pozitivaj rezultoj. Iom atenta studo de la publikigitaj materialoj montras, ke en la postmilita periodo estas farita daŭra, solida progreso, kvankam certe ne spektakla, malgraŭ multaj malfacilaĵoj. Evidentiĝas ankaŭ, ke en multaj kazoj estas rimarkebla konsiderinda fluktuado: enkonduko de la lingvo en la lernejojn kaj instruado dum kelkaj lernejaj jaroj, kaj subita malapero el la instruprogramoj. Aliflanke, ekzistas ankaŭ multe da konstanteco en aliaj kazoj: seninterrompe la samaj lernejoj aperas en la statistikoj. Estas sendube, ke la situacio multe dependas ne nur de la kvalito kaj amplekso de agado en lernejaj medioj, ĉu fare de unuopuloj, ĉu de la kompetentaj Esperanto-organizaĵoj, sed ankaŭ de la starpunkto, kiun havas la edukaj aŭtoritatoj; kaj tiu starpunkto siavice multe dependas de la ĝenerala politika klimato en unuopa lando en difinita periodo.

Plua konkludo estas, ke la malsamecoj rilate la atingojn estas ofte tre grandaj. Se en difinita periodo Esperanto estas instruata en 171 lernejoj kun 5.429 gelernantoj nur en unu lando (Jugoslavio en 1959-60), dum en ĉiuj aliaj 26 landoj ĝi estas instruata en 175 lernejoj kun entute 7.708 gelernantoj, en multaj landoj eĉ nur en unu aŭ du lernejoj kun kelkdeko da gelernantoj, tiam forestas la ekvilibro, kiu estas esence grava por instruado de lingvo vere internacia laŭ siaj karaktero kaj celo. Tio, samtempe, klare indikas

la vojon por plua agado: paralela vastigado de Esperanto-instruado en kiel eble plej multaj lernejoj de diversaj landoj laŭ la modelo de la kunordigaj aktivadoj de Maribor. Nur paralela, samtempa, maksimume egala vastigo garantias solidajn sukcesojn kaj la finan oficialigon en formo de interŝtata konvencio.

4.7 ESENCA BIBLIOGRAFIO

La Esperanto-Societo (diversaj aŭtoroj). Eld. de UEA, Rotterdam 1966.

Stojan, P. E., *Bibliografio de Internacia Lingvo.* Genève 1929.

Ŝirjaev, I., (ĉefred.), *Enciklopedio de Esperanto.* Vol. I kaj II. Budapest 1933-34.

Zamenhof, L. L., *Fundamento de Esperanto* (notoj kaj lingvaj rimarkoj de D-ro A. Albault). Marmande 1963.

Zlatnar, P., *Esperanto kaj Lernejo.* Ljubljana 1959.

Periodaĵoj:

CED-Dokumentoj en la serio B, precipe B/IV/1-15 kaj B/V. *Jarlibro* de UEA, Dua Parto, Rotterdam, 1947-1972, aparte en la ĉapitroj pri lernejoj ekde 1964; aparte ankaŭ p. 133-183 en la Jarlibro por 1971.

DUA PARTO

LITERATURO

ĈAPITRO 5

KARAKTERIZOJ DE LA ESPERANTA LITERATURO

5.1 ESPERANTO KAJ LITERATURO

La Internacia Lingvo estas antaŭ ĉio lingvo. Lingvo estas la manifestiĝo de la hereda homkapablo paroli: tiu lasta evoluis dum la homiĝa procezo, paralele al la evoluo de la laborteknikoj kaj do paralele al la kompleksiĝo de la sociaj rilatoj kaj vivo.

Lingvo estas interhoma socibaza komuniksistemo, kiu esence konsistas el bone difinita, analizebla son-sistemo (kie la sonoj estas en limigita nombro), kaj el bone difinitaj, analizeblaj signif-unuoj (konsistantaj el son-kunmetaĵoj). La kunmeto de la signif-unuoj laŭ analizeblaj reguloj estas la premiso de analizebla homa lingvo: tio signifas, ke homa lingvo devas kapabli transdoni teorie senfinajn signifojn (t.e. realeco-analizerojn, formitajn laŭ lingvaj kategorioj, ĝenerale apartaj laŭ la lingvoj), per nur limigita nombro da lingvaj (sonaj) signoj.

En ĉiu lingvo, la lingva uzo devas kiel eble plej proksimiĝi al socia normo, por ke ĝia efikeco (komprenateco) estu maksimuma.

Sed la socia normo estas io ekstrapolita: ĝi ekzistas ja, sed nur kiel struktura centro, kiel fakta centro de ekzistantaj lingvo-tensioj, do kiel rezultanto de la interago de pluraj fortoj, nur malofte konverĝaj.

Tiu socia normo, kiun ni konsideras dinamika, speguliĝas en la individuoj: inter la socia lingvonormo kaj la lingvo plene individua (kiu povas eventuale esti eĉ nekomprenebla) ekzistas individua normo, kiu estas la rezultanto inter la neceso esti komprenata kaj la neceso enkategoriigi en la ekzistantajn lingvokategoriojn (penskategoriojn)

5 KARAKTERIZOJ DE LA ESPERANTA LITERATURO

ankaŭ perceptojn esence fremdajn al tiuj lingvaj (pensaj) kategorioj.

Estas ĝuste la neceso esprimi lingve nelingvajn spertojn, tio, kio kreas problemon de lingva „elvokiveco" (la problemon de la afekcia nuanco de la lingvo-esprimoj).

Necesas tamen ion tuj klarigi: nelingvaj kategorioj (ekz. afekciaj perceptoj) povas esti tre bone esprimataj per nelingvaj rimedoj: voĉ-aliigo, eksklamoj (aĥ!, oj!), vizaĝesprimoj, gestoj, korpa sinteno, parolrapido, ktp.

Sed en la literatura skriblingvo, kiu dependas ja de alia, aparta socia normo, ĉar ĝi estas uzata alicele kaj sub aliaj kondiĉoj (skribe!) ol la parollingvo, la afero ne estas tiel simpla.

(a) Oni povas uzi eksklamojn, sakrojn, k.a., kompreneblajn, ĉar akceptitajn en lingva normo, aŭ uzi ortografiajn signojn.
(b) Oni povas „eksplike" aldoni klarigojn pere de frazo aŭ adjektivo (kiuj kutime ne povas redoni la tutan intencitan mesaĝon).
(c) Oni povas uzi metaforan eksplikon (tradician — aŭ tute novan, se ĝi estas senpere travidebla).
(ĉ) Oni povas uzi.... nenion! Kaj lasi, ke la leganto mem komprenu, laŭ sia eduko, gusto, socia deveno, vivepoko. Ofte estas tiel, kiam verkisto skribas en tre persona lingvo aŭ por difinita sociklaso. Kaj pro tio ni rimarkas la jenan fenomenon: multaj el la „asociiĝoj", kiujn ni perceptas en la verkoj de la klasikuloj, fakte venas de nia hodiaŭa persona interpreto, kaj ne estis celitaj de la tiamaj aŭtoroj: ni rigardas ilin tra ĉi-epokaj okulvitroj, kaj eltiras konkludojn konformajn al nia hodiaŭa lingva kaj literatura sentemecoj.
(d) Oni povas uzi stilrimedojn, kiuj jam entradiciiĝis. Tio estas tre malfacila. Tiu tradicio estas tre ŝanĝiĝema: ĝi aliiĝas laŭ la epokoj, laŭ la socia deveno de la aŭtoro, kaj ofte laŭ la klasaparteno de la legantoj, celataj de la aŭtoro. Tiu tradicio devas unue ekesti: devas ekekzisti socia homgrupo, kiu interrilatas, eĉ se nur malstrikte, per iaj strukturoj (do devas ekzisti ia/j centro/j), kiu uzas tiun lingvon por literaturaj celoj. Nur tiel, iom post iom, tiuj ŝanĝiĝemaj sed nepre necesaj tradici-bazaj stilrimedoj vekantaj asociiĝojn povas ekesti.

Pli ol 80-jara literatura uzo de Esperanto, originale kaj traduke, ekzistigis, per grupinterna necesprocezo, kvanton da lingvaj esprimrimedoj por nelingvaj esprimendaĵoj. Kiel en ĉiuj lingvoj, ili ne estas ĝenerale eltireblaj el la vortaroj, sed estas aparte lernendaj el la praktika literatura uzo, malsama laŭ la epokoj kaj laŭ la sociaj klasoj.

5.2 ESENCAJ TRAJTOJ

5.2.1 Enkonduko

Unu el la plej nekonataj faktoj estas la ekzisto de originala literaturo esperantlingva.

Dank' al la unua literatura periodo, dum kiu floris ĉefe traduk-literaturo, kaj dum kiu fiksiĝis, tiamaniere, la fundamentoj de lingva kaj kultura tradicioj, povis, je certa momento, kreski propra, aŭtonoma Esperanta literaturo ĝis alta valornivelo.

Tiu originala literaturo estas rigardebla el pluraj vidpunktoj.

5.2.1.1 *Rilatoj inter la Originale Esperantlingva Literaturo kaj la Literaturoj Nacilingvaj.* — Estas nekontestebla fakto, ke ekzistas reciprokaj influoj interliteraturaj. Literaturaj „modoj", ĉiam surbaze de ekonomi-sociaj faktoroj, estiĝas en iu ajn literaturo (ĝenerale en „grava" literaturo, pro kaŭzoj ĉi tie neanalizeblaj), kaj de tie ili migras al aliaj. Tie ili enradikiĝas nur se ekzistas la socia faktoro, kiu faciligis la estiĝon de ĉi tiuj novaj esprimtendencoj en la influanta literaturo; alie, ili efemere aperas sub la plumo de nur malmultaj entuziasmuloj, kaj malaperas senspure. Tiu „modo"-migrado okazas duvoje: tra la tradukoj kaj tra la rekta fremdlingva scio de aŭtoroj.

Iel analoge en Esperanto: sendube la nacilingvaj verkistoj influis la Esperantajn aŭtorojn: ĉu Auld estus pensebla, tia, kia li estas, sen la influo de Ezra Pound? Kaj ĉu Miĥalski sen Majakovskij?

En plurklasa ŝtato rolas kompreneble ankaŭ klaskonsciaj faktoroj: tio eksplikas la estiĝon ekz. en Sovetio, Japanio, Bulgario ktp., de komunistaj verkistoj esperantlingvaj, kiujn oni povas unuigi en aparta, internacia skolo ne nur pro enhavaj similecoj, sed ankaŭ pro ia ĝis nun neniam funde analizita komuna formo. Ĉi tie rolas kompreneble ankaŭ verŝajne nacilingva influo. Ĝi estas plej bone videbla ekz. ĉe Léon Bergiers: li ne estus imagebla ekster sia politika agado en Belgio kaj sen konsidero al lia kono pri la tiama franca socikritika literaturo.

En la literaturo de Esperanto gravas ankaŭ la tradukoj, kvankam verŝajne ne tiom enhave, kiom lingve kaj poetike.

Sed se la supra teorio estus senkorekte valida, la literaturo de Esperanto devus esti multe pli varia kaj multe pli multforma ol ĝi fakte estas.

Ni devas ja konsideri, ke ekzistas unuecigaj faktoroj: la unua estas la interna strukturo de la Esperanta kulturo: tradicio, lingvostudoj, kutimoj. Verkisto-ekzemploj, pli-malpli nivele devigaj aŭ instigaj, unuecige influas la aŭtorojn. La dua estas la fakto, ke la plejparto

de la Esperanto-verkistoj apartenas al eŭropaj landoj, kie, kompare kun Afriko kaj Azio, regas sufiĉe unuecaj ekonomi-sociaj situacioj, kaj kie la lingvoj parolataj apartenas ĝenerale al la sama lingvotipo. Tie, kie la socie-ekonomia situacio evoluis historie tute malsame, kaj kie la lingvo apartenas al lingvotipo tute malsama, tiu „komuneco" estas tiel evidenta, ke pro tio povis kreiĝi naci-influitaj skoloj kun propra, longdaŭra tradicio, kiel ekz. en Japanio.

5.2.1.2 *La Esperanta Literaturo kaj la Internacia Sfero.* — Se ni konscias, ke homo vivas en tri sferoj (regiona, nacia kaj internacia), ni ankaŭ konscias, ke tiuj tri sferoj estas fakte dinamikaj strukturoj, interkonektitaj, kies teoria analizo povas tamen ne ĉiam konfirmiĝi en la praktiko. Ekzemple, por la Romanĉoj ekzistas lingvo familia, vilaĝa, preĝeja, lerneja, radia, revua (la romanĉa), kaj lingvo ĵurnala, politika, ŝtata, scienca, fremdulkontakta (la germana). La tri sferoj ĉi tie ne estas plu divideblaj: ilia konsisto-strukturo dividiĝas laŭ aliaj strukturaj „centroj". Tio neniel malfirmigas la ĝeneralan valoron de la sfero-teorio: ĝi nur instigas la leganton al la teori-strukture dinamika kompreno de tiuj konceptoj.

Cetere, ankaŭ la internacia sfero ne estas io, kio unuece, konstante, senhalte evoluas kaj pligrandiĝas. Ĉar ĝi konsistas el pluraj strukturoj, interkonektitaj inter si kaj kun la subaj strukturaj grupoj (la nacia sfero), ĝi ŝanĝiĝas rezulte de la ŝanĝiĝoj en la kunmetitaj strukturoj. La rezulto de tiuj fortoj estas nomata, sur pli alta nivelo ol la nacia, „internacia": neniel devige, ĝi progrese kaj plivastiĝe antaŭeniras, sed en kelkaj ekonomiaj-politikaj situacioj ĝi povas eĉ malgrandiĝi.

Ĉar Esperanto, pro la konsisto de la kolektivo, kiu ĝin akceptis kaj uzas, estas lingvo de tiu sfero, estiĝas objektiva kontraŭdiro inter la nediskutebla progreso en la disvastiĝo de Esperanto kaj la malgrandiĝo de internacia sfero. Tio, parte, reflektiĝas je kultura nivelo en malkonkordoj.

Analizo de la nuntempaj antagonismoj evidentigas, ke ili fontas ĉefe el la kontraŭaĵo inter la alte evoluintaj rimedoj de produktado kaj la postrestintaj formoj de ekonomiaj, kaj tial ankaŭ de sociaj kaj politikaj rilatoj. Sur internacia nivelo tio, interalie, reflektiĝas en la ekzisto mem de ŝtatoj en la nuna formo, nome aŭ fakte suverenaj aŭ kun suverenecaj pretendoj, kio grave malhelpas aŭ eĉ malebligas kunlaboron en la solvado de mondaj problemoj, daŭre amasiĝantaj, kiuj, fakte, ne estas solveblaj krom per komunaj fortoj. Ĝi ankaŭ kaŭzas la antagonismon inter la riĉaj ŝtatoj, kiuj plu riĉiĝas, kaj la malriĉaj, kiuj relative kaj proporcie plu malriĉiĝas. Ie en la mezo troviĝas pluraj mezgrandaj kaj relative malgrandaj ŝtatoj, kies ekonomia, socia kaj politika sistemo permesas riĉiĝon per propraj,

enlandaj fortoj, sen ekspluatado de aliaj landoj. Kompreneble, interne de ĉiu unuopa ŝtato, depende de ĝia ekonomia-socia-politika strukturo, manifestiĝas multnombraj aliaj antagonismoj, kiuj, en la lasta linio, havas kiel plej profundan radikon la fakton, ke la sociaj, politikaj kaj kulturaj institucioj nur tre malfacile kaj malrapide adaptiĝas al la novaj rimedoj de produktado.

La antagonismoj de la realaĵo reflektiĝas ankaŭ en la literaturo. Tio eksplikas la fakton, ke ankaŭ en la Esperanta literaturo — kaj originala kaj traduka (unuavice koncerne la elekton de la tradukota originalo) — manifestiĝas la samaj kontraŭdiroj. Ĉar Esperanto estas la lingvo de la priskribita internacia sfero kaj spegulas ties internajn kontraŭdirojn, studo de la Esperanta literaturo, precipe originala, sen studo de la nuntempa socia kaj politika realaĵo, povas konduki nur al pseŭdokonkludoj, kaj ne al realecklariga analizo.

5.2.1.3 *La Interna Strukturo de la Originala Esperanta Literaturo.* — Ekzistas tamen ankaŭ historio de la Esperanta lingvokulturo (i.a. de la literaturo). Tio signifas, ke la nunaj Esperantaj verkistoj troviĝas en certaj, analizeblaj rilatoj kun la pasintaj, kaj ke inter la verkistoj ekzistas rilatoj plurnivelaj, el kiuj kelkaj, inter iuj verkistoj, aperas regule: tiun fakton ni nomas „ekzisto de skolo".

Ĉi tie stariĝas la problemo de la periodigo de la Esperanta literaturo.

5.2.1.4 *Periodigo de la Esperanta Literaturo.* — La historion de la Esperanta literaturo oni povas facile dividi en tri periodojn: la unua, ĝis la Unua Mondmilito; la dua, ĝis la Dua Mondmilito; la tria, post la Dua Mondmilito. Ĉi tiu divido estas nescienca: tiuj, kiuj proponis ĝin, tre bone konscias pri tio, sed ĝi estas komforta, kvankam oni povus diskuti pri la jenaj konstatoj:

(a) Se la triparta divido de la poezio (nome de la liriko originala) estas facile konstatebla, ĝi estas tamen nur tre duba koncerne la prozon (ĉefe la novelon), kaj neekzistanta koncerne la romanon kaj la dramon.

(b) Ankaŭ koncerne la lirikon, la periodoj ne dividiĝas klare: ekzistas verkistoj, kies verkoj aperis ankaŭ dum la tria periodo, kvankam ilin oni kutime alkalkulas al la dua periodo; krome, kelkaj poetoj de la unua periodo estas aktivaj ankoraŭ hodiaŭ.

(c) Cetere, okdek jaroj estas tro mallonga tempo por permesi korektan dividon.

Por pli klare enkadrigi la problemon, oni konsideru jenajn punktojn:

(a) Ni tuj rimarkas, ke la verketo de E. Privat *Tra l'Silento* estas enhave tre matura, sed forme ankoraŭ ligita al la unua periodo, dum *Mondo kaj Koro,* de Kalocsay, estas forme revolucia, dum en-

have ĝia parenceco kun la verkoj de la unua periodo estas ankoraŭ videbla almenaŭ esence. Tio povas signifi, ke la aldonoj de novaj enhavoj (signifoj) en formoj klasikaj, sed ĉiam pli perfektaj, en difinita momento eksplodigas la malnovajn formojn, kaj kreas novajn.
(b) Analoge, ankaŭ la enhava nivelo plialtiĝas salte. Sekve, oni konstatas la ekziston de reciproka dependo inter formo kaj enhavo, kiu reliefiĝas el la evoluo de la literaturo.
(c) La rilatoj inter la malsamaj literaturaj brancoj estas ankaŭ konsiderendaj, ĉar ili baziĝas sur la aparta Ligo, kiu ekzistas inter la lingvo kaj la kolektivo, kiu parolas ĝin. Fakte, la parolataj lingvoj havas du ĉefajn apliko-kampojn: unuflanke la esprimon de la personaj analizoj laŭ propraj penso-kategorioj (liriko), aliflanke la esprimon de komunaj, sociaj kaj socie komprenendaj analizoj (teatro). La unuiga sintezo el ambaŭ estas la romano. Laŭ tiu leĝo, Esperanto (komence nura skriblingvo, kun nur tre malstrikte organizita parolanto-kolektivo) prezentis unue lirikan literaturon (nematuran, ĉar la instrumento — la lingvo mem — tiam ne estis jam tute elprovita). Nur poste estiĝis la teatro: ĝi estis unue fuŝa, sed kun la jaroj ĝi pliboniĝis, kiel simptomo de la transformiĝo de la skriblingvo Esperanto al parolata lingvo. La plifirmiĝo kaj pliampleksiĝo de la socia kolektivo, kiu uzas Esperanton, kaŭzos sendube la ekeston de plenvalora teatro; ĝi siavice influos pozitive ankaŭ la romanon, kiu ĝis nun restis ftiza, kun kelkaj esceptoj des pli atentindaj.
(ĉ) Necesas klarigi, ke la postresto de iuj aŭtoroj en la forma kaj enhava evoluo de la literaturo dependas de multaj faktoroj objektivaj kaj subjektivaj (izoleco, persona fiksiĝo al malnovaj formoj, k.a.).
(d) Estas rekonsiderenda la problemo de nacilingva influo je la Esperanta literaturo. Verŝajne la skoloj ne estas tiom „internaciaj", kiom esence „landaj": ĉirkaŭ ili grupiĝas ankaŭ alilandaj aŭtoroj, depende de ilia socia aparteno, mondkonceptoj kaj internacia situacio.

5.2.2 Literaturscienca Studo pri Originalaj Esperanto-Verkistoj

Unu el la plej fruaj aludoj al kreiĝanta literaturo originala estas prelego de Edmond Privat farita en 1911, *Pri Esperanta Literaturo* (eld. 1912), kiu provis analizi la etoson, laŭ kiu ĝi ekestas kaj plue evoluos. En 1932 aperis interesaj, tamen nun iom malnoviĝintaj skizoj de L. Totsche (L. Tárkony) sub la titolo *De Paĝo al Paĝo*. Tiuj priskriboj de pluraj Esperanto-verkistoj havas nuntempe preskaŭ nur historian intereson, ĉar la kadro de la verko estas iom mallarĝa kaj multaj juĝoj profunde aliiĝis. Tamen ĝi enhavas ankoraŭ trafajn konsiderojn. Al *Ora Libro* (1937) F. Szilágyi kontribuis per artikolo „Liriko en Esperanto"; la sama verko enhavas ankaŭ skizon pri la Esperanta prozo.

En *Esperanto 60-jara* (1947) la Nederlandano G. J. Degenkamp pritraktas ĉefe la lingvoevoluon, kiun li dokumentas per elektitaj fragmentoj el diversperiodaj verkoj. La unua provo verki sisteman historion de la Esperanta literaturo estis farita de la Ĉeĥo Vlastimil Novobilský; lia *Skizo pri la Esperanta Literaturo* (1956) iom suferas pro la manko de antaŭaj organikaj historioj. La evoluon de la Esperanta liriko priskribis William Auld en sia antaŭparolo al *Esperanta Antologio* (1958). Didaktike pensita, sed kritike ne ĉiam korekta estas *Kvar Prelegoj pri Esperanta Literaturo* (1960) de la Sloveno Drago Kralj. En 1964 aperis *33 Rakontoj: La Esperanta Novelarto* redaktita de R. Rossetti kaj F. Szilágyi, kun enkonduko de I. Rotkvić. La antaŭparoloj literaturscience analizas la evoluon kaj nunan situacion de la Esperanta prozo. En la dua volumo de *Gvidlibro por Supera Ekzameno* (1966), redaktita de A. Pechan, troviĝas ĉapitro pri la historio de la literaturo en Esperanto, kiun verkis K. Kalocsay kaj Henri Vatré; temas pri kritike valora, informe riĉa, analize trafa superrigardo. Diego Selso (ps. de Adán Hrynkiewicz) prezentis en 1966 resuman enkondukon, *Niaj plej Grandaj Verkistoj.*

Ekzistas kelkaj studoj pri unuopaj verkistoj. Pri Zamenhof aperis sennombraj artikoloj, kiuj prilumas lian agadon kiel iniciatinto de Esperanto, kiel pensulo, kiel oratoro, kiel homarano. Majstran analizon de lia aktivado kiel lirikisto prezentas du artikoloj de Marjorie Boulton kaj de John Francis, aperintaj en *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro,* 1960.

En la unua volumo de *Arĝenta Duopo* (1937) estas pluraj studoj pri Kalocsay kaj Baghy, sed la plej ĝisdataj, kaj metode modernaj, aperis ĉefe postmilite, en *La Nica Literatura Revuo.* Al *Ora Duopo* (1966) S. Szathmári kontribuis studon pri Baghy kaj L. Tárkony pri Kalocsay.

Kalocsay mem studis plurajn poetojn, ĉefe el la unua periodo de Esperanto, en *Norda Prismo:* nome L. Belmont (pseŭdonimo de L. Blumenthal), Cl. Bicknell, St. Z. Braun, M. Hankel, Cz. Kozłowski kaj J. van Schoor. Studojn pri Bulthuis verkis Nekrasov en *La Nova Epoko* kaj en *La Nova Etapo.* La sama Nekrasov aperigis studojn ankaŭ pri T. Jung, N. Hohlov kaj E. Miĥalski (ĉiuj en *La Nova Epoko).* Du studojn, unu pri Varankin, la alian pri Miĥalski, verkis W. Auld en *La Nica Literatura Revuo.*

5.2.3 Ĝeneralaj Karakterizoj de la Esperanta Literaturo

Estas malfacile, ofte eĉ neeble, skizi pritrakton de la ĝeneralaj karakterizoj de literaturo. Ili dependas de la socia konsisto kaj de la historia evoluo de ĝia parolanta kolektivo, kaj ankaŭ de la nombro kaj nivelo de la aŭtoroj, kiuj verkis en tiu lingvo.

5 KARAKTERIZOJ DE LA ESPERANTA LITERATURO

Oni facile povas rimarki, ke el forma vidpunkto la Esperanta literaturo estas kompleta, kelkrilate eĉ pli kompleta ol aliaj literaturoj, ĉar ĝia flekspleko kaj la internacieco de ĝia parolanta kolektivo permesis la akcepton de pluraj diversoriginaj (eĉ eksterhindeŭropaj) beletristikaj formoj.

La koncizeco de Esperanto, ŝuldata al ĝiaj „resumaj" formoj, nacilingven ofte netradukeblaj, faciligis la estiĝon de liriko. Kontraŭe, la fakto, ke Esperanto unue estis preskaŭ ekskluzive skribata lingvo, malfaciligis la estiĝon de dramo kaj de romano. La iom post iom perfektiĝanta transformiĝo de Esperanto en parolatan lingvon kreas la necesajn lingvajn kaj psikologiajn fundamentojn, sur kiuj kreskos kaj floros ankaŭ tiuj branĉoj de la beletro, kiuj ĝis nun ne estis tre sukcesaj.

La enhavaj karakterizoj de la literaturo en Esperanto estas multnombraj kaj malfacile skizeblaj, ĉar ili multe dependas de la verkistoj mem. Tamen frapa estas la ekzisto de ĝenerale homeca kaj humanisma etoso, kiu en la plej sukcesaj verkoj esprimiĝas ne religiece, sed etike, kaj ofte ankaŭ soci-inspire. Tiu humanismo formas la bazon de la lingva (kaj pro tio socia) agado de la Esperanto-Movado kaj estas nedisigebla de la literaturo de Esperanto. Ĝi estas trovebla en ĉiuj literaturaj kampoj: dum la lastaj dudek jaroj oni rimarkas ĝin en ampleksaj poemoj kiuj pritraktas la problemojn de la homo, de la vivo kaj de la mondo (Auld, Francis, De Kock, Chaves, k.a.). Tiuj poemoj, elstaraj forme kaj enhave, estas sendube unu el la plej tipaj trajtoj de la moderna Esperanta literaturo.

Plenrajte oni povas konkludi, ke malofte estas studebla literaturo pli zorge kaj ameme flegata ol la Esperanta literaturo: malgraŭ la limigiteco de la disponeblaj rimedoj, ĝi estas valora juvelo, ĉiam pli kreskanta kaj fajlata; sen troigo oni povas aserti, ke nuntempe Esperanto estas lerninda fare de literatur-amantoj pro la valoro de sia originala literaturo.

Estas utile aldoni, ke delonge establiĝis la kutimo karakterizi diversajn grupojn da verkistoj per la esprimo „skolo". Ekz., jam en la frua periodo oni distingis la francan kaj slavan skolojn. Efektive, pri „skolo" en la vera senco de la vorto oni povas paroli nur se temas pri grupo da aŭtoroj, kiujn kunligas — kaj distingas disde aliaj verkistoj — difinitaj komunaj trajtoj de ilia verkaro el enhava kaj forma vidpunktoj. Juĝante laŭ tiu kriterio oni trovas, ke en la Esperanta originala literaturo tutcerte estas eble apliki tiun terminon al la Budapeŝta kaj, ĝis iu grado, al la Skota Skoloj, malpli al la japana kaj socialista-proleta skoloj, kaj nur kun grandaj rezervoj al aliaj „skoloj": slava, norda, franca ktp. Tamen, sekvante la establitan tradicion, en la sekvanta ĉapitro kaj aliloke en tiu ĉi verko ofte estas

uzata la esprimo ne nur por la Budapeŝta kaj Skota Skoloj, sed ankaŭ por indiki grupojn da aŭtoroj, kiujn markas ilia nacieco aŭ sociaj-politikaj celadoj, sed kies verkaro ne posedas iajn komunajn, aparte signifajn, enhavajn kaj formajn karakterizojn. En tiu lasta kazo „skolo" estas nenio alia ol esprimo por signi difinitan aron da verkistoj, kiuj pro sia nacia origino aŭ socia aparteno kontribuis per siaj verkoj al riĉigo de la Internacia Lingvo ankaŭ el leksikologia kaj stila vidpunktoj.

5.3 ESENCA BIBLIOGRAFIO

Arcaini, Enrico, *Dalla linguistica alla glottodidattica.* Torino 1968.

Auld, William, *L'Espéranto, langue littéraire* (CED-Dok. D/I/3). Londono 1962.

—, „La Internacia Lingvo kiel belarta tradukilo". Lapenna, Ivo (red.), *Memorlibro.* Londono 1960, p. 54-67.

—, *Mitoj kaj faktoj pri Esperanto* (CED-Dok. A/IV/7). Londono 1965.

Falkenhahn, Viktor, „Lingvosciencaj konsideroj pri la rolo kaj strukturo de Esperanto". *Der Esperantist,* vol. 4, 1968, n-ro 18/19, p. 3-11, 17-28.

Gregor, D. B., *La kultura valoro de Esperanto* (CED-Dok. A/IV/8). Londono 1967.

Hollitscher, Walter, *Aggression im Menschenbild.* Frankfurt/Main 1970.

Lapenna, Ivo, *Retoriko.* 3-a eld. Rotterdam 1971.

Manders, W. J. A., *Interlingvistiko kaj Esperantologio.* Purmerend 1950.

Martinet, André, *Grundzüge der allgemeinen Sprachwissenschaft.* Stuttgart 1963.

de Saussure, Ferdinand, *Cours de linguistique générale.* Lausanne-Paris 1916.

Schaff, Adam, *Filosofia del linguaggio.* Roma 1969.

Stalin, Marr, Balibar, *Marxismus und Fragen der Sprachwissenschaft.* München 1968.

Tauli, Valter, *Introduction to a theory of language planning.* Uppsala 1968.

Verloren van Themaat, W. A., „Whorfian linguistic relativism and constructed languages". *International Language Reporter,* vol. 15, 1969, n-ro 53, p. 19-24.

Waringhien, Gaston, *Lingvo kaj vivo.* La Laguna 1959.

Whorf, Benjamin L., *Sprache, Denken, Wirklichkeit.* Reinbek 1963.

ĈAPITRO 6

ORIGINALA BELETRO

6.1 LA MONDLINGVA SITUACIO INTER 1850 KAJ 1887

6.1.1 Mondlingvaj Provoj

Esperanto ne estas la unua provo por la solvo de la mondlingva problemo. Jam en la deksepa kaj dekoka jarcentoj aperis planlingvaj projektoj (paroleblaj, aŭ nur skribeblaj), kelkaj eĉ kompletaj (t.e. kun gramatiko kaj vortaro). Tiuj projektoj estis ĝenerale neuzeblaj, parte pro sia tro artefarita, tro ampleksa, detalsinteza ŝajnfilozofia gramatiko, parte pro la plene apriora vortaro, konstruita laŭ ide-analizaj principoj, kies ellernado superis la parkerkapablojn eĉ de la aŭtoroj mem.

Cetere, en tiu epoko la internacilingva problemo estis sentata preskaŭ nur de kleruloj, je kies dispono efikis tamen ankoraŭ internacie la latina kaj la franca. Krome, tiuj fruaj planlingvistoj ofte komprenis siajn provojn nur kiel instrumenton por „klarigi", t.e. por „racie analizi" la pensojn.

Io ne estas forgesenda: jam tiam aperis kelkaj malmultaj lingvoskemoj (pri io plia ja neniel temas) bazitaj sur la ekzistantaj lingvoj. Plej rimarkindaj tiurilate estas la verko de la franca sciencisto Ph. Labbé (1650) kaj tiu de nekonata germana aŭtoro (pseŭdonimo: Carpophorophilus, 1732). Sed post 1850 la socia situacio ĉiam pli rapide aliiĝis. La burĝa sistemo de produktado troviĝis en plena ekspansio en Britio, Francio, Belgio, kaj starigis la unuajn bazojn en Germanio. En la ekonomike plej evoluintaj ŝtatoj ĝi komencis serĉi novajn merkatojn eksterlandlime kaj transmare.

En ĉi tiu ĉiam pli rapidiĝanta mondo, la apero de la kompleksa ide-analiza kaj detale ellaborita projekto de la hispana prelato *Sotos-Ochando* (1845) ne povis havi daŭran sukceson. Laŭ E. Drezen, la grava politika kaj socia klasaparteno de la aŭtoro permesis al lia projekto atingi ioman disvastiĝintecon: kunhelpis cetere la fakto, ke tiam Hispanio troviĝis ekster la ekevoluanta fluo de la kapitalismo.

Por instrui la projekton de Sotos-Ochando aperis pluraj lernolibroj. Oni publikigis kelkajn provojn de scienca terminologio, broŝurojn, kaj oni fondis propagandan societon kaj eĉ bultenon (1861-1864). Sed la esenca vivmalkapablo de tiu projekto montriĝis en la baldaŭa disfalo de ĝia movado, konsistanta ekskluzive el hispanaj kleruloj.

Multaj aliaj projektoj aperis, poste, ĉiam pli ofte. Kelkaj estis teorie uzeblaj, kiel *Pantos Dimou Glossa*, de la Franco L. de Rudelle (1859), kaj *Universalglot*, de iu nekonata Franco (pseŭdonimo: Pirro, 1868). Ĉefe ĉi-lasta projekto sukcesis kunigi regulecon de la gramatiko kun aposterioreco de la vortotrezoro kaj simpleco de la lingvostrukturo.

6.1.2 Volapük

Nur en 1879 sonoris la horo de tutmonda lingvo praktike uzebla: tiujare la badena prelato Johann Martin Schleyer (1831-1912) publikigis en la revuo *Sionsharfe* (Litzelstetten, Germanio) unuajn skizojn, kaj en 1880 la unuan libron de sia lingvoprojekto Volapük. Dank' al la revuo, kiun Schleyer redaktis, dank' al la energio, per kiu li eklaboris, dank' al la detaleco de la verko, kiun li pretigis, kaj dank' al la reguleco (se ne simpleco), kiun la projekto almenaŭ unuavide ŝajnigis, ĝi iĝis rapide konata.

Tamen, el lingva vidpunkto, Volapük estis nete malsupera al multaj ĝis tiam aperintaj projektoj, ekz. al Universalglot.

Supozeble oni do devas konsideri aliajn kaŭzojn de la sukceso. Unue: la lingva problemo en tiuj jaroj akriĝis; due: la personeco de Schleyer estis sendube altira; trie: la aspekto de Volapük mem ludis rolon: kvankam tre regula, ĝi estis aglutina lingvo tre riĉa de morfologiaj strukturoj, kiuj iel proksimigis ĝin al ia tiutempa (popularscienca) sanskrita „lingva idealo". Volapük baziĝis plue sur la etnaj lingvoj, kvankam ĝi aspektis sekreta lingvo: tio ne estis senefika ĉe la tiutempe kriptografie interesitaj homoj, ekz. A. Kerckhoffs. Ankaŭ ĝia mallongeco ludis rolon: ni ne forgesu, ke en tiu epoko multiĝis la stenografiaj provoj kaj ke mallongeco estis pro tio pli-malpli senkritike tre ŝatata.

La fiasko de Volapük, tiel subita, kiel rapida estis ĝia kresko, ŝuldiĝas al lingvaj kaj movadaj faktoroj. Unu lingva faktoro estis la konstato farita de la volapukistoj, ke aŭtonoma planlingvo povas

funkcii ankaŭ kun multe pli simpla kaj aposteriora strukturo (pro tio multaj el ili postulis lingvan reformon). Alia lingva faktoro estis, ke Volapük estis iom tro haste ellaborita. Tio speguliĝis ankaŭ i.a. en ĝia derivsistemo, kiu estis volapukigita klišo de la germana derivsistemo. Cetere, ankaŭ la belsoneco de la lingvo iom lamis. Aliflanke, ĝia fonetika konstruo malfaciligis la rapidan rekonon de multaj vortoj pro abundo de sufiĉe similaj sonoj. Pro tiuj kaj aliaj difektoj la valoro de Volapük por la komunikado estis do malgranda.

El la movadaj kaŭzoj de la pereo de Volapük, grava estas la aŭtokrata centrigo de la tuta movado kaj de la lingvo-evoluo en la manoj de unu sola persono: Schleyer mem. Tiu ĉi individueca sinteno koliziis kun la demokrata spirito, kiu jam regis ĉ. 1880 en klarvidaj medioj. Ĝi kondukis ankaŭ al manko de evoluo kaj flekseblecо de la lingvo. Tia situacio devigis multajn konsciajn volapukistojn reagi en la maniero sole ebla: nei praktike kaj teorie la lingvan disciplinon.

Cetere, Volapük estis dediĉita ĉefe al scienco kaj al komerco. Kvankam aperis ankaŭ pluraj beletraj Volapük-tradukoj (i.a. poemoj), forestis tiu homaranisma sinteno, kiun Zamenhof sciis inspiri al la unuaj esperantistoj kaj kiu ilin puŝis al agado ankaŭ sur la literatura kampo.

6.2 SOCIA KAJ HEJMA MEDIO DE L. L. ZAMENHOF

L. L. Zamenhof vivis en lando, kie la kapitalismo ekzistis nur embrie. La tiama Rusa Imperio estis ŝtato, kie en 1859 ankoraŭ ekzistis feŭdaj rilatoj, kaj en kiu, ĝis 1917, la burĝa klaso estis politike senrajta antaŭ la aŭtokrate reganta feŭda klaso (grandaj kamparaj posedantoj, generaloj, burokratoj, eklezio, kortego kaj korteganoj: ĝenerale ĉiuj apartenantaj al la nobelaro).

La familio de L. L. Zamenhof apartenis al tiu internaciisma juda etburĝa intelektularo, kies intelekta laboro rezultigis la starigon de kultura fono, en kiu, poste, la plej modernaj okcidentaj revoluciaj ideoj akceptiĝos. Tiamaniere la unua, tipe rusa, kontraŭfeŭda kaj kontraŭkapitalisma, esence etburĝa kaj personisma revolucia movado, la popolismo, kun kamparanutopia komunisma idealo kaj labormetodoj ekstreme individuismaj, iom post iom, cedis teorie kaj praktike antaŭ la marksismo.

Tio ne signifas, ke tiu popolgrupo konscie laboris kontraŭ la caro. Tamen, la tiutempaj Judoj troviĝis meze de gravaj kontraŭdiroj: lingve kaj socie diskriminaciataj, ili serĉis rifuĝejon en la praavan religion, kiu garantiis al ili la dian protekton. Multajn la t.n. juda iluminismo invitis emancipiĝi, tamen gardante la tradiciajn kutimojn kaj religion.

6.2 SOCIA KAJ HEJMA MEDIO DE L.L.ZAMENHOF

Sed la neebleco emancipiĝi, ne forlasante la judan religion, en la cara Rusio, gvidis multajn ree al la tradicia religio, kiun ili interpretis eskatologie; kaj multajn tio kondukis al pozitivisma ateista pozicio. Rezulte, tiuj, kiuj ne volis perdi la tradiciajn judajn valorojn (kaj eventuale la malnovajn religiajn tradiciojn), komencis trovi solvon en la cionisma movado (unue utopie sentata). Pli poste la strebo por emancipiĝo, kaj la deziro konservi la validajn hom-liberigajn tradiciojn de judismo, trovis sian analizan fundamenton, kiu permesis teoriigi la klasajn rolojn de la judismo, en la kadro de la sociklasaj kontraŭdiroj en Rusio, kaj ellabori emancipiĝan teorion kaj taktikon por la socia revolucio.

Marko Zamenhof, la patro de L. L. Zamenhof, klerisma pozitivisto, ateisto, laboris cetere en la cenzura aparato por la caro: tion li faris unuflanke, ĉar en tiu epoko la klasika evoluo de la judisma movado ne jam superis la fazon de la burĝa pozitivismo, kaj, aliflanke, pro la neceso nutri sian familion, do certe ne pro ia mistika amo por la caro aŭ pro intima konvinko. La urbo, en kiu Zamenhof naskiĝis, Bjalistoko (pole Białystok, ruse Bjelostok), estis gente miksita. Laŭ M. Boulton, en 1897 66% de la loĝantaro estis jidparolanta (judreligia), 18% estis Poloj (katolikoj), 8% Rusoj (ortodoksuloj), 6% Germanoj (luteranoj) kaj 2% Bjelorusoj. Inter 1850 kaj 1900 okazis 19 sangaj pogromoj kontraŭ la Judoj, kaj la sociaj kaj ekonomiaj diskriminacioj estis grandaj. Tiuj faktoj komprenigas, kial la tiama situacio en Bjalistoko tiel forte influis Zamenhof sur lingva kaj religi-etika kampoj.

L. L. Zamenhof kreskis en duone klerisma, duone religia (ne bigota) etburĝa medio; la patro influis lin per sia obstino kaj metodeco labori, la patrino heredigis al li sian mildan temperamenton kaj kompaton por la suferantoj. Tiuj du esencaj trajtoj de L. L. Zamenhof, kiuj tiel harmonie kuniĝis kun eksternorma inteligenteco, klarigas, el individuisma vidpunkto, la kaŭzon de la fascino, kiun li elradiis, kaj kiu estis tiel grava dum la unuaj jaroj de Esperanto.

6.3 UNUAJ LINGVAJ PROVOJ

Ni ne volas longe pritrakti la unuajn provojn de L. L. Zamenhof por konstruo de L.I. Ambaŭ projektoj *(Lingwe Uniwersala* (1878) kaj *Lingvo Universala* (1881)) aperis kun lingvaj komentoj de Gaston Waringhien en lia verkego *Lingvo kaj Vivo,* 1959. Verkitaj en tiuj praesperantoj restis tri poemoj originalaj, unu tradukita, kaj pluraj (nefinitaj) tradukitaj rakontoj. Unu el tiuj originalaj poemoj, *Pinto* (penso) aperis remuldite ankaŭ en la hodiaŭa Esperanto (sub la titolo *Mia Penso):* la praesperanta versio estas pli senpere lirikemo-

cie sentata ol la pliposta versio. G. Waringhien demandas sin, ĉu oni povus uzi tiun praesperanton por atingi arkaecajn stilefektojn. Malfeliĉe, la limigiteco de nia kono pri tiu praesperanto, kaj ĝia nekomprenebleco por la nuntempaj esperantistoj, igas tiun proponon ne tre facile efektivigebla, kvankam G. Mattos sukcesis verki du poemojn en tiu praesperanto (*Sperento* kaj *Sutte Allá*, aperintaj en *Arĉoj*, 1967). Tiurilate pli da ŝancoj povus havi la ŝercprojekto de K. Kalocsay, aperinta en *Lingvo Stilo Formo*, 1931 (repr. 1963 kaj 1970), aŭ tiu de M. Halvelik, publikigita en *Arkaika Esperanto*, 1969.

6.4 APERO DE LA „UNUA LIBRO"

La Unua Libro por Rusoj aperis en Varsovio dum la plej alta punkto de la sukcesoparabolo de Volapük. La rapida pereo de tiu projekto igis dubi multajn homojn pri la vivopovo de Esperanto.

Estas tamen atentinde, ke Volapük en la tiama Rusio tute ne estis tiel sukcesa, kiel en la okcidento de Eŭropo, parte ankaŭ pro cenzuraj ĉikanoj. Laŭ E. Drezen, en 1887 la nomaro ĝenerala de ruslandaj volapukistoj nombris nur 186 adresojn. Samjare ekzistis nur unu societo en Moskvo kaj du en Finnlando. Pluraj homoj, ĉefe en Rusio (kaj en la ruslanda Polio) estis altireblaj, des pli, ke ili trovis en Esperanto tiun utopian kaj profetan etoson, kiu mankis en la Volapük-movado: laŭ E. Privat, tiu etoso formiĝis, ĉar en Esperanto esprimiĝas la sopiro de la homaro al unueco, kaj estas ĝuste ĉi tiu fundamenta inspiro, kiu klarigas la sekreton de ĝia viviĝo. Tiu „interna ideo" estis komence pozitiva, sed kiam ĝi fiksiĝis kaj degeneris al ia sentimentala sinteno, preskaŭ religieco, al ia majstro-kulto, en multaj kazoj ĝi transformiĝis de morala instigo al praktika bremso, interna kaj ekstera, por la Movado.

En tia etoso, en etburĝa medio, dividata laŭreligie kaj laŭlingve, kie la unuaj blovoj de kapitalismo en Rusio renkontiĝis kun la restoj de la juda mesiismo kaj kun la pacista, anarkisme utopia penso de la kristanismo de Tolstoj, Esperanto, do, faris siajn unuajn paŝojn en sekteca rondo, iom fermita por sin defendi kontraŭ la volapuka malbonfamo kaj por eskapi eventualajn policajn ĉikanojn.

Laŭ la ekzemplo de Zamenhof, aliaj komencis aperigi la unuajn versaĵojn, la unuajn mallertajn prozajn skizojn. Esperanto ligiĝis al beletro antaŭ ol ligiĝi al komerco kaj scienco. Tio donis al ĝiaj ankoraŭ infanaj strukturoj kulturajn kaj emociajn asociiĝojn, kiuj faciligis ĝian socian enradikiĝon.

La Movado de Esperanto havis ja strukturon (malstriktan), kun ia centro (revua) jam ekde 1889: ĝi funkciis demokrate, adaptiĝante plej bone al la bezonoj kaj al la spirito de la momento. Tiu demo-

krateco speguliĝis tre bone en la fleksebleco de la lingva uzo kaj de la lingva evoluo, kiujn teoriigis, revolucie por la tiama oficiala lingvoscienco, L. L. Zamenhof: „La evoluado de la lingvo", li skribis, „fariĝos plej kredeble nur per tiu sama natura vojo, per kiu ĝi fariĝis en ĉiu alia lingvo, t.e. per la senrompa vojo de neologismoj kaj arĥaismoj."

6.5 L. L. ZAMENHOF: VERKARO KAJ SIGNIFO

L. L. Zamenhof (Bjalistoko 1859 - Varsovio 1917) estis ruslanda Hebreo, okulkuracisto, iniciatinto de la Lingvo Internacia Esperanto.

6.5.1 Unuaj Verkoj

En 1887 Zamenhof aperigis en Varsovio 28-paĝan, grizkovrilan libreton, la Unua Libro por Rusoj. Ĝi enhavis antaŭparolon, 16-regulan gramatikon, ĉ. 900-radikan vortaron kaj lingvoprovojn: tradukojn de *Nia Patro*, el la *Biblio*, poemon el Heine, leter-specimenon kaj du originalajn poemojn: *Mia Penso* kaj *Ho, Mia Kor'*. Baldaŭ sekvis eldonoj por Poloj, Francoj kaj Germanoj, poste por Angloj.

En 1888 (2-a eld. 1893) aperis la 50-paĝa *Dua Libro de l'Lingvo Internacia*. En ties antaŭparolo Zamenhof proponis eldoni tiajn verkojn, dum li finance povos, kaj poste malaperi por ĉiam, por ke la lingvo estu efektive propraĵo de la tuta mondo. Krome enestis lingva ekzercaro, tradukaĵoj de la studenta kanto *Gaudeamus*, el Andersen kaj el Heine (farita de Leo Belmont). Samjare aperis ankaŭ la unua *Adresaro*, kun la adresoj de la unuaj 1.000 esperantistoj.

En 1889 aperis la 22-paĝa *Aldono al la Dua Libro*, kie Zamenhof raportis pri la Amerika Filozofia Societo. Li skribis, ke li seniĝas je ĉiuj rajtoj pri la lingvo kaj ke li deziras esti konsiderata nur kiel iniciatinto. Samjare aperis la unua numero de *La Esperantisto*, en Nürnberg: la centro de la Movado ne plu estis unu sola homo, sed periodaĵo.

6.5.2 Instruaj Verkoj

La *Unua Libro* ne havis sufiĉe ampleksan vortaron. Jam la unuaj esperantistoj komprenis tion, sed estis ĉefe Zamenhof, kiu en siaj verkoj proponis por komuna uzado plurajn trafajn kunmetaĵojn kaj multajn novajn radikojn. En 1894 aperis la 2.599-radika *Universala Vortaro* kun traduko de la Esperantaj radikoj en la franca, angla, germana, rusa kaj pola. Samjare publikiĝis ankaŭ la *Ekzercaro (Kon-*

kordanco de la Ekzercaro, de A. E. Wackrill, aperis en 1907). Plue aperis la unua kajero de *Granda Vortaro Germana-Esperanta* (represita en 1968). Jam en 1899 estis eldonita *Plena Vortaro Rusa-Internacia*. En 1903 Zamenhof mem korektis la stilekzemplan *Fundamenta Krestomatio*, kun tradukoj kaj originalaĵoj de multaj aŭtoroj. *Fundamento de Esperanto*, enhavanta la 16-regulan gramatikon, Universalan Vortaron kaj Ekzercaron, aperis en 1905; ĝia 9-a eldono estis publikigita en 1963 kun filologia aparato de A. Albault. En 1912 (6-a eld. 1962, red. G. Waringhien) aperis liaj *Lingvaj Respondoj*, ĉerpitaj el *La Esperantisto* (1889-95), *La Revuo* (1906-08) kaj *Oficiala Gazeto Esperantista* (1911-12).

Duobla, kaj iom kontraŭdira, estas la signifo de la prilingva verkaro de Zamenhof. Unuflanke, ĝi eminente riĉigis la stilon kaj la vortaron de Esperanto; aliflanke, ĝi fariĝis, nebone komprenita, ia deviga ekzemplo por multaj, kaj je certa momento ĝi eĉ transformiĝis en evolubremson de la lingvo mem.

6.5.3 Tradukaj Verkoj

La unua grava tradukaĵo estis *La Batalo de l'Vivo* de Charles Dickens, felietone aperinta en *La Esperantisto* en 1891. Libroforme ĝi estis presita nur en 1910. Tial la verko ne havis grandan influon. Sed jam en 1894 aperis *Hamleto* de Shakespeare, en versa traduko, kelkfoje simpliga, kelkfoje ne tre fidela, sed entute bela verko, lingve harmonia, valora literaturaĵo en Esperanto, kiu ĝuis longan kaj merititan sukceson (8-a eld. 1964). Subskribinte la kontrakton kun Hachette, Zamenhof povis dediĉi sin al pli senzorga traduka aktivado. Tion li faris kun sia kutima lingvosento kaj profunda lingvomajstrado. En 1907 aperis la komedio de Gogol, *La Revizoro*, en 1908 *Georgo Dandin*, komedio de Molière, kaj en la sama jaro la tragedio de Goethe, *Ifigenio en Taŭrido*, kaj *La Rabistoj* de Schiller. En 1910 aperis la romano *Marta* de Eliza Orzeszko. Samjare venis ankaŭ la *Proverbaro* (reeldonita en 1961 kun filologia aranĝo de Rogister kaj Waringhien), vera trezorejo de ofte spritaj, ĉiam trafaj esprimoj. Unue por la kolumnoj de *La Revuo*, Zamenhof tradukis *La Gimnazio* de Ŝalom-Aleĥem (1910) kaj *La Rabeno de Bañarañ* de Heinrich Heine (1914); libroforma eldono aperis en 1924. Lia traduko de *Fabeloj de Andersen* libroforme aperis nur postmorte: la unua volumo en 1923 (2-a eld. 1926, 3-a eld. 1965), la dua en 1926, la tria en 1932, la kvara en 1963.

El la *Malnova Testamento* Zamenhof tradukis: *La Predikanto* (1907), *La Psalmaro* (1908), *La Sentencoj de Salomono* (1909), *Genezo* (1911), *Eliro* (1912), *Levidoj* (1912), *Nombroj* (1914), *Read-*



D-ro L.L.Zamenhof estis ne nur la aŭtoro de la lingvo, sed ankaŭ la unua verkisto en la Internacia Lingvo. Li verkis originalan poezion, eseojn kaj paroladojn, kaj tradukis el pluraj lingvoj, el ĉiuj literatur-branĉoj.

mono (1914). La tuta *Malnova Testamento,* reviziita de anglikanaj pastoroj, aperis en 1926.

Liaj tradukaj verkoj estis gravaj kiel instigo al plua verkado kaj por la kompletigo kaj fiksado de literaturaj lingvo kaj stilo. Zamenhof, kiel unua, jam en 1894 pruvis, ke en la Internacian Lingvon oni povas traduki eĉ la plej grandajn poeziajn ĉefverkojn, se la laboron pretigas kompetenta beletristo. Tio rekte kontraŭis la tiamajn lingvosciencajn teoriojn pri la funkcio kaj la esprimkapablo de „artefarita" lingvo, kiuj influis ankaŭ la interlingvajn movadojn, i.a. tiun de Volapük, kaj pli poste tiun de Ido.

6.5.4 Originalaj Poemoj

Zamenhof verkis tre malmulte da originalaj poemoj. Lian poezian verkadon, sur lirika kampo, inspiris emociaj momentoj. Liaj verkoj havis sukceson, ĉar ili enhavis ĝuste tion, kio estis tiumomente necesa, t.e. la lirikan esprimon de certa venko kaj de la ĝenerala kaj iom nebula idealisma „homaranismo", kiu gvidis multajn esperantistojn. Forme, la zamenhofaj poemoj estis sufiĉe ritmaj, sufiĉe klaraj kaj sufiĉe belsonaj por faciligi agrablan reciton kaj taŭgan parkeron.

6.5.5 Originalaj Eseoj

En siaj eseoj L. L. Zamenhof eksplikis neordinarajn vidpunktojn pri lingvaj kaj interlingvaj problemoj, pri politikaj kaj filozofiaj demandoj, kaj pri organizaj problemoj. La unua eseo aperis en 1889-1890 en *La Esperantisto: Esperanto kaj Volapük,* kaj restis nefinita. La dua, tre grava, estis verkita en 1899 aŭ 1900, kaj aperis en *Fundamenta Krestomatio: Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia.* Pri siaj interreligiaj projektoj li verkis plurajn broŝurojn: *Dogmoj de Hilelismo* (1906) kaj *Homaranismo* (1906, 1913). *Memuaro Verkita por la Kongreso de Rasoj* (Gentoj kaj Lingvo Internacia) aperis en 1911. *Alvoko al la Diplomatoj,* verkita dummilite, aperis en 1915. Ĉio troviĝas en *Originala Verkaro,* 1929.

6.5.6 Oratoraĵoj

Zamenhof ne estis elstara oratoro. Li sekvis stilon klasikan, lia voĉo ne estis tre forta kaj tre impresa, nek lia aspekto estis impona. Sed kiam li ekparolis emocie, li kapablis tuŝi la korokordojn de la esperantistoj: lia sincereco kaj lia veramo katenis la atenton de la aŭskultantoj. Ekde la Unua Kongreso en Boulogne-sur-Mer ĝis la 8-a Kongreso en Krakovo (1912), kiam li oficiale rezignis je plua ankaŭ nur morala gvidado de la Movado, kaj refariĝis „privata es-

perantisto", liaj malfermaj paroladoj estis altinspire emocivekaj momentoj por la tiamaj aŭskultantoj. Kuraĝe li pritraktis politikajn problemojn (la pogromojn), demandojn pri organizado kaj pri interlingvistiko, la ideologion de Esperanto, ktp. Ĉio ĉi troveblas en *Originala Verkaro*, 1929.

6.5.7 Gazetartikoloj kaj Leteroj

Zamenhof verkis sennombrajn gazetartikolojn por tre multe da periodaĵoj. Oni kolektis ilin en *Originala Verkaro*, 1929. Tre gravaj estis ankaŭ liaj leteroj. Per ili, dum la unuaj du jaroj, Zamenhof kunligis la tiam malgrandan Movadon. Ili prezentas belan dokumenton pri la homeco de la iniciatinto de Esperanto, samkiel pri la historio de la Movado kaj de la lingvo mem.

6.5.8 Kolektitaj Verkoj

Ĉiuj originalaj verkoj de Zamenhof (poemoj, gazetartikoloj, traktaĵoj, oratoraĵoj, enkondukoj kaj kelkaj leteroj) aperis en *Originala Verkaro*, redaktita de J. Dietterle, 1929. Por lingve interesatoj aperis ankaŭ *Konkordanco al la OV*, de Fenton Stancliff, 1937. La *Leteroj* de Zamenhof aperis, en filologie senmanka redakto de Gaston Waringhien, en 1948: la unua volumo (1901-1906), la dua volumo (1906-1917). En 1963 aperis ankaŭ la kolekto *Paroladoj kaj Poemoj*.

6.6 ORIGINALA BELETRO 1887 - 1918

6.6.1 Enkonduko

Dum la unua periodo de la Esperanta literaturo aktivis tri ĉefaj skoloj. La unua estas la *slava skolo*, konsistanta el la plej unuaj literaturistoj. Parto el ili estis samaĝuloj de Zamenhof, aliaj apartenis al pli juna generacio. Ili ekverkis antaŭ 1900, kaj la plej junaj pluverkis ĝis 1920. Ilia karakterizo estas la sendependo, el lingva kaj stila vidpunktoj, de francaj „logikaj" lingvo-klišoj. Aliflanke ilin karakterizas ankaŭ la relativa abundo je puraj lirikaj voĉoj.

Inter 1890 kaj 1902 aktivis modesta, stile senapartaĵa skolo: la *norda skolo*, kiu reprezentiĝis ĉefe per prozverkistoj.

Post 1900, kaj ĝis proks. 1920, aktivis kroma literatura movado: la *franca skolo*, kun centro en Parizo. Ĝia ĉefa karakterizo estas inklino al eseoj, artikoloj (belstilaj kaj ofte profundaj), sed ne al liriko aŭ al artisma prozrekreo de fantaziaj inventaĵoj. La malmultaj

lirikaj poetoj de ĉi tiu skolo fakte ne estas Francoj, kaj ankaŭ stile neniam sekvis la parizan skolon.

La franca kaj la slava skoloj aktivis unu apud la alia. Ili tamen ne multe influis sin reciproke, ĉar ilin regis aparta spirito, kaj ili laboris en apartaj lingvokampoj.

Kvankam la hiato inter la antaŭmilitaj kaj la intermilitaj skoloj estas granda, tamen estas ĝuste konsideri la slavan skolon ligomembro: la francaj doktrinoj, ĉefe ĝis 1908, estis la antipodoj de tiuj de la novaperinta Budapeŝta Skolo.

Sed interne de la franca skolo mem, ĉefe post 1908, eksplodis lingvaj kontraŭdiroj: inter konservativaj, neologismomalamikaj, novotimaj esperantologoj, kaj pli malfermitaj, pli liberalaj homoj.

Krome, post 1908, la logikema influo de De Beaufront malkreskis: la laboroj de De Saussure radike detruis tiun stilon, kaj formis la bazon de plua lingva prilaboro, kiun poste pretigis la Budapeŝta Skolo.

6.6.2 La Unuaj Komunaj Verkoj

La unua poezia verko, kun poemoj de Grabowski, Kofman, Devjatnin, Felikso Zamenhof, Seleznev, Goldberg, De Wahl, estis redaktita de A. Grabowski mem, kaj aperigita en 1893: *La Liro de la Esperantistoj*. Tiuj poemoj estis jam parte aperintaj en *La Esperantisto*, kaj poste reaperis en la poezia parto de *Fundamenta Krestomatio*, 1903.

Du verkoj reprezente resumas la originalan aktivadon sur literatura kampo ĝis 1900. Unu estas la *Fundamenta Krestomatio* (FK), la alia *Esperantaj Prozaĵoj* (EP).

FK aperis en 1903 (18-a eld. en 1969). Ĝi enhavas lingvajn ekzercojn, fabelojn, legendojn, anekdotojn, sciencaĵojn, artikolojn pri Esperanto, kaj 70 poemojn (unu triono de la tuta libro, tradukitajn kaj originalajn), ĉerpitajn el *La Esperantisto* (1889-1895) kaj el la verketoj aperintaj inter 1887 kaj 1902.

Esperantaj Prozaĵoj, 1902, enhavis fabelojn, novelojn, skizojn, modelajn prozaĵojn eltiritajn el *L'Espérantiste* de De Beaufront. La pli varia enhavo kaj la redakto de L. L. Zamenhof garantiis al FK longtempan sukceson, dum male pri EP oni hodiaŭ apenaŭ plu parolas.

6.6.3 La Poeziaj Skoloj de la Unua Periodo

6.6.3.1 *La Slava Skolo (Unua Generacio).* — En FK aperis originalaj poemoj de pluraj ankoraŭ nuntempe legataj poetoj (i.a. de Devjatnin, L. L. Zamenhof, A. Kofman, F. Zamenhof), kaj de komplete

forgesitaj nomoj (i.a. de M. Goldberg, D. Jegorov, I. Lojko, A. Naumann, W. Waher, k.a.). Kelkaj el la ĉi-lastaj eminentiĝis kiel aktivuloj, kiel tradukistoj aŭ kiel artikolistoj. Aliaj senspure malaperis.


La slava skolo, kiu daŭris ĝis 1916-1920, kaj estas dividebla laŭ du generacioj, havas gvidan kvinopon, konsistantan el A. Grabowski, V. N. Devjatnin, Leo Belmont, A. Kofman kaj Felikso Zamenhof, ĉiuj reprezentitaj en FK.

La pola kemi-inĝeniero kaj poligloto *Antoni Grabowski* (1857-1921), esperantisto ekde 1887, persona amiko de Zamenhof, kaj kiu forlasis la Movadon dum 1894-1903, abunde verkis traduke, ĉefe el la pola kaj el la rusa. Liaj tradukaj ĉefverkoj estas *Mazepa*, de Słowacki, 1912, la internacia antologio poezia *El Parnaso de Popoloj*, 1912, kaj ties daŭrigo *Postrikolto*, 1921, kaj la epopeo de Mickiewicz, *Sinjoro Tadeo*, 1918 (2-a eldono 1955). Grabowski elstaris en la traduko de poezio: li povis tion fari majstre, kun ritmoj abundaj kaj rimoj riĉaj kaj variaj. Liaj tradukaĵoj estas krome ankaŭ fidelaj, kaj karakterizataj de persona stilo kaj feliĉa vortotrovemo. Liaj originalaj poemoj, tre malmultaj, troviĝas en *El Parnaso de Popoloj*, 1912, kaj ilin karakterizas bona tekniko kaj persona, originala kapablo ellabori emociajn materialojn. Tio igis liajn verkojn ŝatataj, kaj ankoraŭ nun ĝueblaj.

La rusa instruisto *Vasilij Nikolajeviĉ Devjatnin* (1862-1938), esperantisto ekde 1891, abunde tradukis elruse kaj elgermane, kaj verkis iomete ankaŭ originale. Lia unua libroforma poezia verko originala estas *Nevola Mortiginto*, 1896. Li estis poeto kun ritmoj kaj rimoj eble ne tre variaj, sed kapablo ellabori ankaŭ komplikan materialon en fajna, emociveka maniero. Sufiĉe interesaj estas ankaŭ liaj satiraj verketoj *(Unuaj Esperantaj Satiroj)*. Lia plena verkaro aperis en 1906 (1-a kaj 2-a volumoj), en 1908 (3-a volumo) kaj en 1911 (4-a volumo). Li aktivis ankaŭ sur teatra kampo.

La pola Hebreo *Leo Belmont* (ps. de Leopold Blumenthal, 1865-1941), esperantisto ekde 1887, aktivis kiel verkisto kaj redaktoro ankaŭ nacilingve. Entute, li verkis proks. 100 librojn. Li kontribuis al multaj gazetoj per tradukaĵoj kaj originalaĵoj. Tre bonaj estas liaj eseoj. En 1908 aperis lia poemkolekto (ankaŭ kun tradukaĵoj) *Sonoj Esperantaj*.

La rusa librotenisto *Antoni Kofman* (1865-1940?), esperantisto ekde 1889, kunlaboris aktive en pluraj revuoj per originalaĵoj kaj per multaj, lingve interesaj, ĉar kuraĝe entreprenitaj, tradukaĵoj. Liaj originalaĵoj konsistas el epigramecaj satiraĵoj kaj el la originala rakontpoemo *Filino de Iftah*. Malfeliĉe li forlasis Esperanton en 1908, kaj liaj nepridubeblaj talentoj tiel forperdiĝis.




V.N.Devjatnin:
Talento
sen metia polureco.



Supre: Felix Zamenhof verkis poemojn, kiujn karakterizis ekstera brilo. Malsupre: Leo Belmont abunde verkis ankaŭ alilingve.



Stanislav Schulhof, la unua matura lirikisto en la literaturo.



La kvina poeto estis la frato de D-ro Zamenhof, *Felikso Zamenhof* (1868-1933), farmaciisto. Li estis poeto facilinspira, kun temoj eble iom suprajaj, kvankam teknike elegantaj. Liaj verkoj aperis en la unuaj periodajoj esperantistaj, kaj en *La Revuo, Ondo de Esperanto, Literatura Mondo.* Libroforme aperis *Homa doloro*, 1905, kaj *Verkaro de FeZ*, kolektita de Edw. Wiesenfeld, 1935.

Aliaj poetoj estas reprezentitaj en FK. El ili elstaras la litova pastro *A. Dambrauskas* (Dombrovski, 1860-1938). Li verkis en la litova, en la rusa, en la pola, en la latina kaj en Esperanto (kiun li lernis en 1887). Li postlasis multnombrajn tradukajojn, originalajn matematiklibretojn kaj prifilozofian libron. En 1905 aperis lia *Versajareto*, kun religietosaj poemoj.

Ankaŭ de la Ruso *I. Seleznev* (mortinta en 1904) aperis verkoj en FK. Li tradukis el Gorkij, kunlaboris al gazetoj kaj lasis kelkajn originalajn verkojn. Fine, de *Miĥail Solovjev* (1874-1950), Ruso, aperis verkoj originalaj ne nur en FK, sed ankaŭ en *La Revuo, Heroldo de Esperanto* kaj *La Suda Stelo.*

6.6.3.2 *La Norda Skolo.* — La transporto de la redakcio de *Lingvo Internacia*, do de la organiza centro de la tiama Movado, al Svedio, kaŭzis ankaŭ la multiĝon de interesaj verkistoj tie. Ili aktivis ĉefe artikole kaj proze. Tamen, okazajn versajojn (aperintajn i.a. en FK) verkis V. Langlet (1872-1960), K. Svanbom, k.a.

6.6.3.3 *La Franca Skolo.* — La poezia rikolto de la franca skolo estas, kiel jam dirite, nur malgranda. Kelkaj poemoj de Célestin Rousseau (1861-1949), esperantisto ekde 1902, aperis, kun milda, kelkfoje iom malserena romantika emocieco. Liaj poemoj aperis en *Amo, Fonto de Vivo*, 1939.

De la licea fizikinstruisto *Henri Sentis* (1850-1933), esperantisto ekde 1898, kiu verkis ankaŭ rakontojn, aperis poemoj *Por Esperanto* en 1912 kaj alia poemkolekto, *En Montoj*, 1927, kun delikata sentemo.

Sed la plej granda estas la internacieca Sviso *Edmond Privat* (1889-1962), kies poemkolekto *Tra l' Silento* aperis en 1912 (nun ĝi troviĝas en *Junaĝa Verkaro*, 1960). E. Privat estas la unua vere lirika voĉo de nia literaturo. Kun Schulhof, li konkludas periodon kaj aludas al nova. La temoj de la poezio de Privat, kvankam ne ĉiam ĝisfunde ellaboritaj, neniam impresas skize suprajaj. Liaj versoj estas ĉiam glate harmoniaj, sen malspontanaj ŝtopvortoj. Malfeliĉe, Privat dediĉis sin tiel multe al la Esperanta Movado kaj al aliaj idealismofonaj movadoj, ke li povis verki sur poezia kampo nur junaĝe. Estas, krome, tre konataj la kontribuoj de Privat al historiografio, al skizarto, al oratorado, al teatro kaj al scienco.

6.6.3.4 *La Slava Skolo (Dua Generacio).* — Kelkaj Slavoj komencis sian literaturan agadon nur post 1900, kaj, do, aperigis siajn verkojn

samtempe kun la verkistoj de la franca skolo. Estas atentinde, ke ne ekzistas hiato inter la du generacioj slavaj: nek literature nek tempe. Male, pluraj unuageneraciaj verkistoj ankoraŭ aktivas dum la duageneracia periodo (i.a. Devjatnin, Belmont, FeZ, Grabowski, k.a.). Pluraj el ili poluras sian stilon, kaj, sub la influo de la multiĝantaj tradukaĵoj, kapablas superi la nuran emocian nivelon en la liriko, ellaborante pli detale kaj pli signife la formon kaj la enhavon.

De *Leono Zamenhof* (1875-1934), frato de L. L. Zamenhof, esperantisto ekde 1898, tradukinto el Świętochowski kaj el Wyspiański, aperis kelkaj verkoj poeziaj, kiuj estis kolektitaj en *Mia Liro*, 1909.

De la rusa gimnazia direktoro *Romano Frenkel* aperis multaj versaĵoj kaj tradukaĵoj en pluraj tiamaj kulturaj revuoj. Liaj originalaj poemoj, kun natura simpleco kaj sincera lirikeco, teknike iom primitivaj, eble, sed ne suprajaj, aperis en *Verdaj Fajreroj*, 1908, verko siatempe tre ŝatata.

La rusa oficisto *Georgo Deŝkin* (1891-1967), esperantisto ekde 1908, eldonis *Versaĵoj* en 1912. En 1957 aperis *Elektitaj versaĵoj 1909-1956*. Deŝkin estas poeto de lirikaj emocioj, de pejzaĝoj: siatempe sendube talente avangarda poeto, li tamen neniam plue evoluis, tiel ke liaj verkoj fariĝis iom antikviĝintaj, ankaŭ se ne sencarmaj.

En 1912 aperis *Unuaj Agordoj*, poemaro de Wiktor Elski (ps. de *Stanisław Zygmunt Braun*, pola oficisto; 1893-1956) kaj de Eska (ps. de *Stanisław Karolczyk*, Polo, 1890-1966). De Braun, rezignaci-etosa poeto, aperis ankaŭ aliaj verkoj (originalaj kaj tradukaj) en la revuoj de la jaroj 1912-1920. Pli malmultajn aperigis Karolczyk.

Samjare eldoniĝis la poemaro de la pola studento (poste verkisto) Czesław Jastrzębiec *Kozłowski* (1894-1956), *Petaloj*. La aŭtoro forlasis Esperanton en 1914. La poemoj de Kozłowski estas tipe junulaj, kun ia ne bone difinebla melankolia bazetoso.

Ĵus antaŭ la Unua Mondmilito, en 1914, aperis la poemaro de la Polo *Juliusz Kriss* (1891-1959), *Melodioj de l'Nokto*, kun versaĵoj iom romantikaj, kiuj pritraktas ankaŭ junulajn temojn, kiel amon, nokton, tristecon ...

Dummilite aperis nur unu atentinda verko: *Dorna Karesilo*, 1917, de la Ruso *Boris Mirski* (ps. Bela Manto). Temas pri poemetaro satira, kun temoj sufiĉe bone ellaboritaj, kaj taŭga stilo por afabla satiremo. En tiuj jaroj verkis ĉefe enrevue la delikata, artisme sentanta Rusino Maria Stanislavovna *Tenner*, kiu ankaŭ tradukis verkon de Tolstoj (1911).

Sed la ĉefa slava duageneracia verkisto estas sendube la ĉeĥa dentkuracisto *Stanislav Schulhof* (1864-1919). Liaj originalaj poemoj estas kolektitaj en la tri verketoj *Per Espero al Despero*, 1911; *Kion la Vivo Alportis*, 1911; kaj *Aŭtunaj Floroj*, 1912. Lia verkaro pruvas,

ke li estis matura lirika poeto, kun stilo bone ellaborita kaj poemstrukturo interne konsekvenca. Liaj temoj estas melankoliaj, aŭ gajetaj, aŭ rezignaciaj: liaj verkoj tuŝas nin emocie ankoraŭ hodiaŭ.

6.6.3.5 *Aliaj Poetoj.* — La plej konata tiutempa poetino estis la Germanino *Marie Hankel* (1844-1929). Ŝiaj originalaj versaĵoj aperis en la kolekto *Sableroj*, 1911, kaj en multaj tiutempaj revuoj. En 1909 ŝi estis kronita Reĝino de la Floraj Ludoj. Sed ŝia graveco estas nun ekskluzive historia. Al ni ŝi povas plu nenion diri. Ŝiaj poemoj komunikas al ni ne multon: ili enhavas nur tre ĝeneralajn emociajn konceptojn ne ellaboritajn, en formo iom primitiva, kie tro multe da vortoj — tutaj versoj, eĉ tutaj strofoj — troviĝas tie ne pro internstruktura neceso, sed por ŝtopi rimajn aŭ ritmajn breĉojn. Ŝia sukceso estas jene eksplikebla: ŝi mirinde interprete spegulis la psikologian kaj kulturan (ideologie verdisman) nivelon de la tiama Esperanto-Movado.

Siatempe ŝatata, sed iom primitiva poeto estas ankaŭ la angla matematikisto *Clarence Bicknell* (1842-1918), esperantisto ekde 1897. Li loĝis longtempe en Italio. Okaze verkis poemojn (krome, artikolojn kaj lernolibrojn) ankaŭ la Ital-Ĉeĥino *Rosa Junck* (1850-1929). Iom pli interesaj, kaj ankoraŭ hodiaŭ legeblaj, estas la verkoj de la angla lingvoinstruisto *Albert Edward Styler* (1865-1928). Liaj poemoj aperis en *En la Dolomitoj*, 1914. Ankaŭ de la Anglo *Giles Leigh Browne* (1883-1919), esperantisto ekde 1909, aperis bonaj originalaj poemoj, ĉefe en *La Revuo*. Li aktivis ankaŭ traduke. La Usonanino *Celia Doerner* (1853-1918) tradukis kelkajn verkojn, kaj aperigis ankaŭ kelkajn originalajn poemojn.

De la hispana pioniro *Vicente Inglada-Ors* aperis en 1909 *Prozaĵoj kaj Versoj*. Pli gravaj estas tamen liaj tradukaj laboroj kaj tiuj en la teatra kampo. De la kroata oficiro *Mavro Špicer* (1862-1936) aperis kelkaj originalaj poemoj, kvankam lia plej merita agado estis sur la traduka kaj lernolibra kampoj. De la Nederlandano C. Ch. Droogendijk (mortinta en 1918) aperis kolekto el simplaj poemoj: *Esperantaj Poemoj*, 1917.

6.6.4 La Prozaj Skoloj de la Unua Periodo

6.6.4.1 *Enkonduko.* — Ankaŭ ĉi-kampe FK estas bona, reprezenta kolektoverko. Aperis originalaj prozaĵoj de la ĉeĥdevena Brazilano Fr. V. Lorenz, de iu Odesano Enbe, de V. Devjatnin kaj de la Germano L. E. Meier. En *Esperantaj Prozaĵoj* aperis originalaj skizoj aŭ noveletoj de A. Kofman, L. Bernot, Cl. Bicknell, F. A. Postnikov (1872-1952), A. Hasselrot, L. de Beaufront, S. Meyer, K. M. Nordensvan, R. Lemaire, K. Boguševiĉ, kaj de aliaj.

La plejmulto el la originalaj rakontoj de *Esperantaj Prozaĵoj* (temas ĉefe pri skizoj, ne pri veraj noveloj) estas bonaj ekzemploj de la tiama prozo: la invento ne mankis, kvankam la tuton ruinigis kelkfoje banala solvo: la stilo bedaŭrinde estis iom tro unutona kaj sennuanca. Ankaŭ la rakontaĵon ĝenis ofte diletanteca sinteno rilate la internstrukturan kontinuecon.

6.6.4.2 *La Slava Skolo (Unua Generacio).* — La plej granda parto aperis en revuoj: ĉefe en *Lingvo Internacia.* Tamen aperis ankaŭ libroformaj verketoj: de *V. Stankievič* la skizaro *El la Vivo de Esperantistoj*, 1896, de la teherana Ruso *Abesgus*, mortinta en 1930, la rakonto *Kraljevič Marko,* 1896; samjare aperis la premiita rakonto de la Polo Józef *Waśniewski* (1859-1897), *En la Brikejo,* kiu estas verŝajne la plej altnivela rezulto de tiu epoko.

Kontribuis ankaŭ aro da lingvokleraj esperantistoj, kiuj aktivis sur artikola, esea kaj lingva kampoj. Multaj eminentis traduke. Kelkaj jam estas cititaj, ĉar ili verkis ankaŭ originalajn poemojn. Aliaj memorindaj estas Samuel Ŝatunovskij (1859-1929), K. I. Ŝidlovskij (1858-1920), Vl. Gernet (1870-1929), Vl. Szmurlo (1865-1931), N. Borovko (1863-1913), N. A. Kazi-Girej (1866-1917), k.m.a.

6.6.4.3 *La Norda Skolo.* — *Esperantaj Prozaĵoj* enhavas tri novelojn de la Finno Karl Magnus *Nordensvan* (1850-1903), kortega konsilanto. La verkisto uzas artifikajn temojn, kaj verkas realisme, kun granda harmonio inter lingvo, rakontostrukturo kaj disvolviĝo. Iom romantika, la aŭtoro tamen efikas kredeble, kaj neniam falas en sentimentalecon.

Alia novelisto estis la sveda pastoro Otto W. *Zeidlitz,* kies *Du Mirrakontoj* aperis en 1898.

Pliaj tiamaj nordaj prozverkistoj (kiuj tamen nur okaze verkis novelojn) estis V. Langlet (1872-1960), Per Ahlberg (n. 1864) kaj Paul Nylén (1870-1958): ili verkis multnombrajn artikolojn kaj lingvajn eseojn.

6.6.4.4 *La Franca Skolo.* — Ĝis 1902-1905 la stilo de la francaj verkistoj dependis de la lingvaj konsiloj kaj respondoj pretigitaj de L. de Beaufront. En iliaj manoj, la lingvo estis uzata tre korekte, sed iom rigide, tro afiksoriĉe kaj neflekseble. Post la fino de la influo de De Beaufront naskiĝis aliaj tendencoj. Unu skolo, kiu ĉirkaŭis *La Revuon,* kaj kiu trovis sian nestoron en Carlo Bourlet, proponis lingvon malfermitan, riĉan, favoran al la multiĝo de la neologismoj. La alia, kiu ĉirkaŭis Th. Cart kaj lian *Lingvo Internacia,* pledis por severa kontraŭneologisma sinteno. La franca periodo prezentis multe da kapablaj tradukantoj, multajn lingvoesplorantojn (estis la epoko de la Ido-krizo, do de la unuaj paŝoj de la esperantologio kiel esplora kaj normiga lingvoscienca branĉo). Multiĝis ankaŭ la

sciencaj verkistoj, kaj fiksiĝis la Esperanta ĵurnalista lingvo. Malfeliĉe, partoprenis ne tiom multe da originalaj prozverkistoj. (a) *Beletraj Prozverkistoj:* Malmultaj el la beletraj prozverkistoj estas citindaj. Aperis porinfana noveleto de Emile Boirac, *Perdita kaj Retrovita,* en 1905. De Ernest Deligny aperis *Nekredeblaj Aventuroj de Sinjoro Radamanto.* René Beck verkis la ĉarman novelon *La Mistera Sinjorino,* 1913. De Claudius Colas (1884-1914) aperis la kristnaska rakonto *La Lignoŝuoj,* 1914; li verkis ankaŭ aliajn novelojn kaj lingvajn studojn. De Boucon aperis la verko *Humcraĵoj* en 1919. Tiaspeca verko, de la Hungaro Francion enmigrinta Paul de Lengyel (1868-1932) aperis jam en 1899 (2-a eld. 1908): *Libro de l' Humoraĵo.* Li estis pli konata kiel artikolisto: en *Lingvo Internacia, Juna Esperantisto, La Revuo, Literatura Mondo,* ktp. Iom pli interesaj estas la nun eksmodaj, romantikecaj kaj iom naivaj noveloj de Jeanne Flourens (ps. Roksano). Kelkaj el ili aperis en la novelaro *La Senlaca Sinofero,* 1912. Ŝi estas pli konata pro siaj artikoloj pri literaturo, pri modo, pri virinaj aferoj, kaj pro siaj teatraĵoj. De la licea fizikprofesoro Henri Sentis (1850-1933), esperantisto ekde 1898, aperis la novelo *Urso,* 1906 (2-a eld. 1928) kaj la rakonto *Blua Kardo,* 1923. La kuracisto René Artigues (1860-1950) aperigis kelkajn interesajn novelojn en *Lingvo Internacia* kaj en *La Revuo.* Kelkajn originalajn novelojn aperigis ankaŭ S. Meyer (1864-1921), el kiuj unu troviĝas en *Esperantaj Prozaĵoj,* 1902. Li estis tamen pli konata pro siaj tradukaĵoj.

Tre interesaj estas la aŭtobigrafiaj skizoj de Edmond Privat aperintaj en *Aventuroj de Pioniro,* 1963: la aŭtoro priskribas kelkajn gravajn eventojn kaj renkontiĝojn en sia junaĝo, kun sprito kaj skizemo.

Sed la — almenaŭ kvante — plej eminenta tiutempa aŭtoro estis sendube Henri Vallienne (1854-1908), kuracisto. Li multe tradukis (i.a. la tutan Eneidon!) kaj postmorte oni malkovris multajn neeldonitajn manuskriptojn de tradukaĵoj el De Musset, Fénelon, Ovidius, k.a. En 1908 li estis proklamita la plej granda stilisto esperantlingva post K. Bein. Sed tiun juĝon ni povas konsideri iom entuziasme troa. Liaj ĉefverkoj estas du dikaj romanoj: *Kastelo de Prelongo,* 1907, kaj *Ĉu li?,* 1908 (reeld. 1938). Ambaŭ konsistas el la tipaj ingrediencoj de la tiama felietona romano: amo, pasio, romantiko, aventuroj, krimoj, mistero, identkonfuzoj, ktp., ĉio plektita en sufiĉe neverŝajna intrigo, kun ĉefpersonoj psikologie nekredeblaj, rakontdisvolviĝo nenecese komplika kaj stilo peza, maleleganta. El la du romanoj, supozeble nur la dua estas hodiaŭ ankoraŭ legebla, sed kun la lingvaj korektoj de K. Kalocsay.

(b) *Sciencaj Prozverkistoj:* En tiu epoko formiĝis la scienca lingvo Esperanta. Elstara estis la kontribuo de Edmond Privat, kiu aktivis

ĉefe intermilite: per multnombraj paroladoj pri lingvaj, literaturaj kaj internacijuraj temoj, kaj per verkoj kiel *Ĉe l'Koro de Eŭropo*, 1909; *Historio de Esperanto*, I: 1912; II: 1927; *Vivo de Zamenhof*, 1920 (12 eldonoj), *Interpopola Konduto*, 1934; *Federala Sperto*, 1954; kaj *Vivo de Gandhi*, 1967. Alia Sviso estis la ĝeneva psikologo kaj pedagogo Pierre Bovet (1878-1965), kiu, same tiel, aktivis ĉefe intermilite.

Sciencistaj stilistoj kaj elstaraj esperantologoj estis ankaŭ Charles Verax (1873-1943), fotisto, la matematikisto Charles Laisant (1841-1920), generalo Hippolyte Sebert (1839-1930), la matematikisto Charles Méray (1835-1911), la fizikisto Daniel Berthelot (1866-1927), la lingvisto Charles Lambert (1866-1943), la kuracisto Maurice Briquet (1865-1953), la fizikisto Aimé Cotton (1869-1951), kaj Maurice Rollet-de-l'Isle (1859-1943), kiu verkis ankaŭ pri lingvaj problemoj.

(c) *Prilingvaj Prozverkistoj:* Prilingve verkis multaj, preskaŭ ĉiuj tiamaj movadaj eminentuloj. La unua stilisto estis L. de Beaufront (1855-1935): li estis, krome, lingvisto, aktivulo, artikolisto kaj eminenta polemikisto. Li enkondukis la unuajn Esperantajn ekzamenojn kaj kodigis la tiaman „logikan" kaj „korektan" lingvo-uzon. Alia tre grava stilmajstro, teoria kaj praktika, estis la lingvisto Théophile Cart (1855-1931), kiu aktivis ankaŭ kiel vortaristo, polemikisto kaj artikolisto (en *Lingvo Internacia*, 1913-1917, tre ŝatataj estis liaj artikoloj *Biletoj de Blankbarbulo*). Aktivaj sur la lingva kampo estis ankaŭ la multmerita pioniro Paul Fruictier (1879-1947), Camille Aymonier (1866-1951), Pierre Corret (1881-1936), Gabriel Chavet (1880-1972), Louis Bastien (1869-1961) kaj la Sviso René de Saussure (1872-1943), kiu ellaboris la korektan teorion de la Esperanta vortkunmetado, neniigante tiamaniere la tezojn de Couturat.

(ĉ) *Artikolistoj:* En ĉi tiu periodo fiksiĝis la ĵurnalisma lingvo. Preskaŭ ĉiuj eminentuloj (movadaj, lingvaj, tradukaj, sciencaj, originalliteraturaj) verkis artikolojn. Elstaraj estas, krom tiuj menciitaj en (c), Auguste Capé (ps. Montrosier, 1868-1916), Jean Couteaux (1884-1961), Carlo Bourlet (1866-1913), kiu krome agadis sur lingva kaj beletra kampoj, kaj la Sviso Hector Hodler (1887-1920), fondinto de UEA, aktivulo, artikolisto, kiu pretigis ankaŭ kelkajn tradukojn. Liaj korespondaĵoj plenigas 12 volumojn!

(d) *Kulture gravaj verkistoj,* krom la cititaj, estis i.a. barono Félicien Menu-de-Ménil (1860-1930); li aktivis ankaŭ ĵurnalisme, precipe en *La Revuo*, kiun li ĉefredaktis en 1906-1914; lia edzino, Sophie Menu-de-Ménil (1870-1925), Jeanne Ranfaing Zabilon-d'Her (ps. Evidino, 1868-1924), Emile Boirac (1851-1917): filozofo, stilisto, gramatikisto, artikolisto, tradukisto valora, René Deshays (1870-1940), Maria Milsom (ps. Ramo, 1851-1933), Gaston Moch (1859-1948): es-

perantisto ekde 1889, pacisto, tradukisto, fakverkisto, Emile Peltier (1870-1909), Eugène Noël (1855-1913), kiu famiĝis pro siaj tradukoj kaj siaj recenzoj, Ernest Deligny (1864-1950), kiu multe tradukis kaj verkis artikolojn, kaj fine du Svisoj: Jean Borel (1868-1946), ĵurnalisto, eldonisto, redaktoro, tradukinto, kiu aktivis ĉefe en Germanio (Berlino), kaj Edmond Privat, la unua kiu provis kuraĝe antaŭskizi la evoluvojon de la tiam juna Esperanta literaturo *(Pri Esperanta Literaturo,* parolado, 1912).

6.6.4.5 *La Slava Skolo (Dua Generacio).* — La plej konata tiuepoka prozverkisto estis sendube la pola kuracisto Kazimierz Bein (ps. Kabe, 1872-1959). Li konatiĝis inter la esperantistoj en 1904 kaj forlasis la Movadon en 1911, je la zenito de sia literatura kariero. Li ne verkis originale, sed nur traduke. Tamen li profunde influis la tiaman prozverkadon, kiun tiutempe regis la stilo de De Beaufront. Lia influo igis la lingvon pli fleksebla, pli libera, pli eleganta. Bein interesiĝis ankaŭ pri lingvaj demandoj: li aperigis i.a. vortaron Esperanta-Esperantan.

Tre interesa estas la rusa originala novelisto Ivan Genadjeviĉ Ŝirjaev (1887-1933), pastro kaj instruisto, kiu esperantistiĝis en 1895. Li estis premiita de SFPE kaj dum la Floraj Ludoj. Liaj noveloj estas kolektitaj en *Sep Rakontoj* (sub la ps. Ivan Malfeliĉulo), 1906 (2-a eld. 1908); *La Ciganino,* 1907; *Tra la Loko Ensorĉita,* 1913; *Forta Impreso,* 1914; *Peko de Kain,* 1932; *En la Vagono* (kaj aliaj rakontoj), 1937. Li multe tradukis, sed nenion eldonis. Li estis novelisto talenta, kun kapablo profunde analizi la realon, kaj kredebligi siajn literaturajn kreaĵojn. Bedaŭrinde la tiama situacio estis malfavora, kaj tiu verva, kelkfoje brile skiza verkisto neniam povis ĝisfunde kultivi sian talenton.

De la Ruso Herschel Hall aperis en 1913 la novelo *La Premiito.* Samjare aperis la rakonto de A. A. Saĥarov (1865-1942), *Superforta Ambicio,* skizo kun simbola signifo pri la Esperanta Movado. Li estis cetere valora ĵurnalisto (lia artikolaro *Sur Vojo al Kunfratiĝo de Popoloj* aperis en 1907), redaktoro de *Ondo de Esperanto* (1909-1917), kaj poste aktivis en la soveta komunista Esperanto-Movado.

6.6.4.6 *Aliaj Prozverkistoj.* — De la hungara pioniro August Marich aperis en 1911 *Skizoj el Mia Propagandista Vivo.*

Eklaboris pluraj Angloj: en 1913 aperis la skizaro de A. E. Styler *En la Montoj,* kaj en 1914 la rakonto de Richard Sharpe (1844-1923) *Travivaĵoj de Ro Ŝo.* Temas pri aŭtobiografia verko en tro simpla formo: nur „faktoj", sen ia interpreto psikologia aŭ eventa. En 1915 publikiĝis la utopieca filozofi-socikritika romano teozofio-fona de la arkitekta desegnisto H. B. Hyams (ps. Tagulo, m. 1960): *Nova Sento* (2-a eld. 1925). En 1919 aperis la iom romantikstile eksmoda romano

de Alleyne Sinnotte, *Lilio*, kie ne mankas travivaĵoj feliĉaj kaj malfeliĉaj, sed fine la Bono estas premiita kaj la Malbono punata (aŭ respektive pardonata).

La Kataluno Frederic Pujulà-i-Vallès (1877-1963), esperantisto ekde 1905, eldonis en 1908 du rakontojn: *La Grafo Erarinta* kaj *Naivulo*.

De la Hispano José Garzón-Ruiz (1871-?) aperis artikolaro *Kelkaj Andaluziaj Moroj*, 1910, kaj prijura monografio.

La Italo A. Rivier aperigis la rakonton *En Rusujo per Esperanto*, 1911. De D-ro Leunbach aperis la originala novelo *Ne Juĝu*, 1914.

Kaj, fine, anoncis sin ankaŭ la unuaj ekstereŭropaj prozverkistoj: la unuajn tradukojn, la unuajn originalajn skizojn kaj artikolojn verkis la Japanoj Ĉif toŝio kaj Fukuta kunitaro.

6.6.4.7 *Kulture Gravaj Aktivuloj Slavaj kaj Alilandaj.* — Kvankam plej multaj el ili ne verkis originale sur la beletra kampo, ili estis tamen gravaj pro siaj tradukaĵoj, lingvaj studoj, artikoloj. El la *rusaj*, ni rimarkas: Paŭlo Medem (1862-1924), kiu pretigis lernolibrojn kaj tradukis; Andreo Fiŝer, kuracisto (1855-1930), kiu tradukis en lingvo ŝpruce moderna el Turgenev, Gogol, Puŝkin; Timofej Ŝĉavinskij (1862-1921); Anna Ŝarapova (1863-1923), kapabla tradukantino. El la *Poloj* elstaras la interlingvistoj Boris Kotzin (1887-) kaj Adam Zakrzewski (1856-1921).

El la *alilandaj*, ĉefe *traduke kaj artikolare* aktivis la angla inĝeniero Alfred Wackrill (1862-1924), la Anglo Harold Bolingbroke Mudie (1880-1916), la Anglo Daniel Lambert (1852-1930), la francdevena Anglo Achille Motteau (1836-1906), la Flandro Hector Vermuyten (1899-1966), la Germano Siegfried Lederer (1861-1911), la Germano Ludwig Emil Meier (1866-1916), kiu tradukis el Schiller, Heyse, Bölsche, Grillparzer, Lessing, la Flandro Amatus van der Biest-Andelhof (1850-1912).

El la *alilandaj, ĉefe prilingve*, sed ankaŭ traduke kaj artikolare aktivis la angla pastoro J. C. Rust (m. 1927), klera lingvisto, tradukanto kaj predikisto, la Flandro Marcel Merckens (1873-1911), la Hispano Ricardo Codorniu-y-Starico (1846-1923), la Germano Albin Moebusz (1871-1934), la Germano Friedrich Pillath (ps. Zanoni, m. 1932), la Germano Eduard Mybs (1858-1923), la Germano Albert Schramm (1880-1937), la Germano Gustav Hermann Göhl (1859-1931), la Germano Wilhelm Velten (1841-1928), la Germano Ernst Kliemke (ps. Heinrich Nienkamp, 1870-1929), la germandevena Anglo Herbert F. Höveler (ps. Ĉefeĉ, 1859-1918): li iniciatis la aperigon de la famaj „ŝlosiloj" kaj aktivis ankaŭ sur la esperantologia kampo, kie li ellaboris teorion de la Esperanta kunmetsistemo, kiu kontraŭis tiun de De Saussure.

6.6.5 La Originala Teatro dum la Unua Periodo

La ĉeftrajto de la tiutempa teatro estis, stile, la manko de komunuza ĉiutaga lingvo, kaj, enhave, la celo krei amuzan verkon. La tiamaj teatraĵoj devis esti utiligataj por agrabla grupvespero. Ili ne havis artajn pretendojn. Pro tio, ankaŭ, nenio artisma estas eltirebla el la tiutempaj verkoj. Ekzemple, en la kvarvoluma *Plena Verkaro* de la Ruso Vasilij N. Devjatnin estas troveblaj tri senpretendaj verketoj teatraj: *Edziĝo, Nefinita Dramo, Instruita Mimikisto.* Samajn komentojn ni povas fari pri la komedieto de s-ino Vallienne *La Gasto,* 1906; pri la komedieto de Marie Hankel *La Renkonto,* 1908; la du amuzaĵoj de la Hispano Miguel Cases-Martín, aperintaj samlibre en 1908: *Unu Fojon* kaj *Vivu Esperanto.* De la sama aŭtoro aperis en 1910 ankaŭ la unuakta amuza komedio *Mistera Krimo.* De la Meksikano Ramón Limones aperis en 1910 la komedio *Veneno,* en aparte malbona lingvo. De iu hispana Johano Poplo aperis la amuza sceno pri la Esperantista Movado *S-ro Alsanojs en Barcelono.* Kvalite pli bona estas la originala farso de la hispana naturscienciisto Vicente Inglada-Ors (1879-1949), kiu multe tradukis kaj aktivis prilingve: *Edziĝo Malaranĝita,* 1907.

Pli altajn pretendojn havas la du dramoj de Nadina Kolowrat, *Misteroj de Amo,* 1909, la triakta versa dramo de R. Unterman, *En Danĝero,* 1911, kaj la dramo de la itala eldonisto A. Paolet (1880-1960), *Ensorĉo,* 1915.

Interesaj estas la dramoj de la franca komercistino Jeanne Flourens (ps. Roksano, 1871-1928), en kiuj ŝi prezentas ankaŭ aktualajn problemojn, kiel ekz. la virinan egalrajtecon, kvankam la evoluo de la intrigo okazas ĉiam laŭ la kutimaj leĝoj de amuziĝo. Ŝi aperigis la komediojn *Duonsurda,* 1907 (2-a eldono 1922); *La Fianĉiniĝo de Sovaĝulineto,* 1909 (2-a eld. 1922); *Geedziĝopeto,* 1913; kaj la dialogon *La Morgaŭa Virino,* 1912.

De la Germano Reinhold Schmidt (1867-1943) aperis en 1910 klasikforma poezia dramo *Gustav Vasa.* Tiu verko estas tamen peza, pene komprenebla pro torditaj kaj malnaturaj frazoj, kaj la intrigo estas iom senmova kaj kelkfoje plumpa, tiel ke la legado estas laciga, kaj la spektado malfacila. Ĝi restas grava, ĉar ĝi estas la unua provo de tragedio, kiu ne celas esence la grupan vivon. De la sama aŭtoro aperis ankaŭ burĝfona komedieto: *La Amkonkurantoj,* 1911. Interesa aŭtoro estas ankaŭ la Kataluno Frederic Pujulà-i-Vallès (1877-1963): en 1909 aperis liaj du tragediaj dramoj pri la frenezo: *Frenezo* kaj *Aŭtunaj Ventoj.* Temas pri verkoj kiuj kaptas la atenton de la leganto ĝis la fino, kvankam ili bezonus kelkajn lingvajn ĝustigojn, kaj malgraŭ la fakto, ke nia gusto trovas ilin eble iom

tro romantikaj. La aŭtoro kreas intrigon, kiu disvolviĝas tute realisme en atmosfero, kiu iom post iom preterrealismiĝas. La sama aŭtoro aperigis en 1909 kvin monologojn: *La Rompantoj.*

La lasta teatra verkisto, kiun oni ne rajtus preteratenti, estas la Sviso Edmond Privat. Li verkis unu solan teatraĵon, kiu estis ankaŭ sukcese recitita: *Ginevra,* 1913 (nun en *Junaĝa Verkaro,* 1960). La aŭtoro sukcesis plekti sian pacistan mesaĝon kun interesveka amintrigo. La versoj de la dramo estas belaj, neniam patosaj; ili ofte iĝas lirike kristalaj. Estas komuna opinio, ke en la dramo mankas iom da teatra drameco. Recitoj okazis dum la UK-oj de 1913 kaj de 1925.

6.6.6 Konkludaj Verkoj

Se la konkludaj verkoj de la plej frua periodo estis FK, 1903, kaj *Esperantaj Prozaĵoj,* 1902, por la dua generacio de verkistoj mankas komparebla verko. Sed por la franca skolo, interesa estas la verketo *Laŭroj,* aperinta en 1908, kun kolekto el originalaj verkoj premiitaj en la unua literatura konkurso de *La Revuo.* Tie aperis verkoj de Artigues, Inglada, Hodler, van Melckebeke, Ellis, Boucon, s-ino Vallienne, Gambier, Deligny, Bulthuis kaj Trinité.

Alia verko, kiu konkludis la unuan periodon, sed malfermis ankaŭ novan, estas la malgranda originalpoezia antologio de P. Hitrov: *Guto post Guto,* 1923. Ĝi enhavis originalajn poemojn de L. L. Zamenhof, Marie Hankel, Edmond Privat, M. Solovjev, St. Schulhof, N. Nekrasov, J. Kriss, G. Deŝkin, St. Karolczyk, k.a. (entute de 21 poetoj).

6.7 ORIGINALA BELETRO 1919 - 1945

6.7.1 Poezio

6.7.1.1 *La Budapeŝta Skolo.* — La Budapeŝta Skolo formiĝis ĉirkaŭ literatura revuo, *Literatura Mondo,* kaj du eminentaj verkistoj: Kálmán (Kolomano) Kalocsay kaj Gyula (Julio) Baghy. Tiu skolo profunde influis la poezian teknikon, kiun por la unua fojo ĝi kodigis: la poezia verkado perdis ĉian diletantecan trajton. La nivelo atingita de la hungaraj aŭtoroj instigis kaj faciligis ĉiulande tiun evoluon. Rimarkindaj estas la lingvaj eseoj kaj studoj, kiuj fontas de la Budapeŝta Skolo, kaj ties influo je la tradukarto: ekde 1925 sur la poezia kampo multiĝis elstare bonaj tradukaĵoj.

Unu el la ĉefaj verkistoj de la Budapeŝta Skolo, la kuracisto *Kálmán Kalocsay* (1891-), estas esperantisto ekde 1911. Li aktivis



Kálmán Kalocsay, genia poeto, kiu maturigis la lingvon.



Hilda Dresen: Elstara melankolia versaro de la unua granda poetino.

Strečita Kordo, la vojmontra verko.



ankaŭ sur la traduka kampo: liaj tradukaj ĉefverkoj estas *Johano la Brava* (de Petöfi), 1923; *La Tragedio de l'Homo* (de Madách), 1924 (reeldonita en 1965); *Eterna Bukedo* (poezia antologio el 22 lingvoj), 1931; *Romaj Elegioj* (de Goethe), 1932; (kun aliaj) *Hungara Antologio,* 1933; *Infero* (de Dante Alighieri), 1933; (kun aliaj) *La Floroj de l'Malbono* (de Baudelaire), 1957; (kun aliaj) *Kantoj kaj Romancoj* (de Heine), 1969; *Reĝo Lear* (de Shakespeare), 1966; *Libero kaj Amo* (de Petöfi), 1970. Grandega estas ankaŭ lia rolo kiel esperantologo, kiel literaturkritikisto kaj sur literaturteknika kampo.

En 1921, kiam aperis lia unua poemaro originala *Mondo kaj Koro* (senŝanĝe fotorepresita en 1970), oni tuj perceptis, ke nova, granda voĉo por la unua fojo aŭdiĝas en la originala literaturo. En 1931 aperis lia poemkolekto *Streĉita Kordo,* ampleksa ekzemplo de atingita arta kaj teknika matureco. Kalocsay, en sep cikloj, poetas kelkfoje pure lirikan, intimisman poezion; kelkfoje li iĝas tuthomara poeto, kiu eposspire interpretas la dezirojn kaj la sopirojn de la homoj. Li scias enprofundiĝi en la abismojn de memanalizo: li rekreas lirike, kun potenca krio, la homan malkapablon kontentiĝi, kaj la internan instinkton al ĉiam pli malproksimaj konkeroj. Li povas ankaŭ plene forlasi la formojn por sekvi senregulan inspiron, kie li esprimiĝas en diboĉe persona lingvo, virtuoze eleganta kaj samtempe sincera, kie ĉiu vorto estas nepre necesa, kaj havas propran sencan kaj estetikan funkcion. En 1931 aperis ankaŭ liaj *Rimportretoj,* spritaj rondelformaj poemoj pri pluraj tiamaj movadaj gravuloj. En 1939 estis preta lia nova poemaro *Izolo,* kiu pro la milita situacio ne povis tamen disvastiĝi. En 1956 aperis *Ezopa Saĝo,* poezia fabelrekreo de la antikvagrekaj popolsaĝulaj rakontoj. Oni reeldonis kelkajn el liaj poemoj en *La Kremo de Kalocsay,* 1971, kaj valora poemo pri la poezia arto aperis, sub la pseŭdonimo „C. E. R. Bumy" en *Parnasa Gvidlibro,* 1932 (dua eld. kompletigita 1968).

Dummilite kaj postmilite Kalocsay silentis plurjare pro la malfavora politika situacio. Sed post la reekfunkcio de la hungara Movado, denove aperis liaj verkoj. Liaj poemoj troveblas en multaj revuoj: i.a. en *Literatura Mondo* (en ĉiuj tri periodoj), *La Nica Literatura Revuo, Hungara Vivo, Monda Kulturo,* k.a.

El la literaturhistoria vidpunkto Kalocsay signas momenton esence gravan en la disvastiĝo kaj fortikiĝo de la Esperanta kulturo: Kalocsay estas fakte ne nur la unua Esperanta poeto, kiu laŭnivele estas plene komparebla al kiu ajn nacilingva poeto, sed samtempe ankaŭ unu el la plej eminentaj.

Julio Baghy (1891-1967) estis verkisto kaj aktoro. Li aliĝis al la Esperanta Movado en 1911. Baghy estis emocie lirika interpretanto de tiu fundamenta homeco, kiu estas la komuna bazo de la internacilingva kolektivo. Pro tio li estas unu el la plej „esperantistaj" poetoj, kiun neesperantisto povas nur malfacile kompreni. Liaj poemoj estas melodie spontanaj kaj formabundaj: ilia ritmo dependas de la momenta inspiro kaj povas aliiĝi laŭ la neceso. Baghy aktivis ankaŭ sur la romana, novela kaj teatra kampoj.

Lia unua poemaro aperis en 1922: *Preter la Vivo*, kiu estas versâajne ankaŭ lia ĉefverko. Sekvis la poemaro *Pilgrimo*, 1926, kaj *La Vagabondo Kantas*, 1933. La plej senpere lirikeca estas la unua. En la lasta (de 1933) lia ritmo- kaj rimo-abundo tie kaj tie kovras mankojn de inspiro kaj de temanalizo. Liaj poeziaj materialoj venas grandparte el liaj spertoj dum la siberia militkaptiteco. En 1966 aperis *Ĉielarko*, versa reverko de fabeloj de 12 popoloj. Lia lasta poemaro, *Aŭtunaj folioj*, estis publikigita postmorte en 1970.

Lajos Tárkony (antaŭmilite: Ludoviko Totsche, 1902-), profesia oficisto, estas esperantisto ekde 1919. Li aktivis traduke (el Karinthy, 1934), kaj por *Hungara Antologio*, 1933; krome verkis literaturkritikan esearon (*De Paĝo al Paĝo*, 1932); kunlaboris en pluraj revuoj, i.a. en *Literatura Mondo* kaj *La Nica Literatura Revuo*.

Liaj poemoj originalaj aperis en *Dekdu Poetoj*, 1934. Sed lia maturaĝa verko estas la granda poemkolekto *Soifo*, 1964. La tieaj poemoj estas ekzemploj de forma perfekteco, apud ekzemploj de senpere lirika esprimo per liberaj versoj. Tárkony havas preskaŭ muzikan senton por la ritmo. Li estas poeto de ĉiutagaj, momentaj okazaĵoj, sed ankaŭ de emocia kunsento pri tuthomaraj problemoj, kiujn li projekcias tra sia esence lirika personeco.

Imre Baranyai (ps. Emba, 1902-1961) estis poeto, kiu fruaĝe akceptis la klasbatalajn instruojn de Marx, kaj iĝis unu el la gvidantoj de la hungara laborista Esperanto-Movado. Baranyai poeziigis sian sopiron por pli justa mondo kaj profetan motivon pri la revolucio. Lia malfacila vivo kaŭzis tiun amaran senton, kiu reflektiĝas en liaj poemoj, ankaŭ kiam la momenta inspiro estas gaja. Teknike li ne estas tiel elstara, kiel la unuaj du poetoj, sed li impresas senpere.

Li verkis ankaŭ novelojn kaj romanon. Lia poezia verkaro troviĝas en *La Profeto* (kun tradukaĵoj), 1934; *En Ekzilo*, 1938; *Ekzilo kaj Azilo*, 1962.

La Hungaro *Ferenc Szilágyi* (1895-1967), pli fama kiel prozverkisto, verkis ankaŭ originalajn poemojn, kiuj parte aperis en *Dekdu Poetoj*, 1934. Liaj poeziaj verkoj, malabundaj, estas framoj delikataj kaj elegantaj, kiujn li teksas vorte kun fajna artisma sento.

Li multe tradukis el la hungara kaj el la sveda (longtempe li

loĝis en Svedio, kies civitanecon li alprenis).

Sekretaj Sonetoj, de la verkisto *Peter Peneter* (1891-1953), aperis en 1932. Temas pri ciklo de 52 forme perfektaj sonetoj pri la seksĝuaj malkovroj de amanta paro. En 1965 ili reaperis en *Libro de Amo,* kun aldonita parto, originala kaj traduka, de lia filo *Georgo Peterido Peneter.* Estas sufiĉe ĝenerala opinio, ke sub Peter Peneter kaŝiĝas fakte iu bone konata hungara verkisto.

6.7.1.2 *Ĉirkaŭ la Budapeŝta Skolo.* —

a) *Ĉirkaŭbaltaj aŭtoroj:* La plej eminenta el ili estis *Hilda Dresen,* Estonino (1896-), radiotelegrafistino, kiu abunde verkis ankaŭ traduke. Ŝi lernis Esperanton en 1916, kaj kunlaboris al *Literatura Mondo, La Nica Literatura Revuo, Norda Prismo,* k.a. Ŝiaj poemoj aperis en *12 Poetoj,* 1934, kaj en *Norda Naturo,* 1967. Ŝiaj temoj koncernas precipe la naturon kaj emociajn momentojn, kiujn ŝi disvolvas en iom melankolia, sed neniel sentimentaleca tono, kun elstara versomelodieco. Rimarkinda verkisto estis ankaŭ alia Estono, la popollerneja instruisto *Hendrik Adamson* (1891-1946), kiu verkis ankaŭ originalan novelon kaj estas konata kiel nacilingva poeto. Liaj verkoj aperis en *Dekdu Poetoj,* 1934, kaj en *Vesperkanto,* 1967. Ankaŭ ĉe Adamson la baztono estas melankolio, sed kun rezignacia sento, fontanta el la multaj suferoj kaj seniluziiĝoj, kiujn li devis elporti. Ĉi tiun grizkoloran tonon respegulas ankaŭ liaj ampoemoj kaj poemoj pri la naturo, kiu por li estis rifuĝejo.

Tria grava poeto estis la latva ŝtatoficisto *Nikolao Kurzens* (1910-1958). Liaj verkoj aperis en *Ondo de Daŭgava* (kiun li redaktis inter 1932 kaj 1934), *Literatura Mondo, Norda Literaturo.* Libroforme, ili aperis en *Dekdu Poetoj,* 1934, kaj en *Mia Spektro,* 1938. Li aktivis ankaŭ sur traduka kampo. Li estas poeto de la vivo-efemero, kaj de la neceso epikure — eble eĉ nur memimage — ĝui la malmultajn plezurojn, kiujn ĝi prezentas. Sed li estas ankaŭ poeto de la subitaj ribelekflamoj, kiuj ne longe daŭras, ĉar li refalas en tiun pasivece rezignacian staton, kiun li nomas „tedo".

Aperis originalaj poemoj ankaŭ de la Estonino *Helmi Dresen* (1892-1941), de la Litovo *B. Giedra,* kies poemvolumo *Violetoj,* parte tradukita kaj parte originala, publikiĝis en 1938, de la Latvino *Ludmila Jevsejeva* (1913-), kies poemoj aperis en *Literatura Mondo, La Suda Stelo* kaj en la antologio *Naŭ Poetoj,* 1938, de la Latvo *Augusts Kažoks* (1881-1937), kiu multe tradukis, redaktis *Ondo de Daŭgava* (1925-1931), kunlaboris al *Literatura Mondo* kaj aperigis kelkajn originalaĵojn.

(b) *Ĝermanaj verkistoj:* En *Svedio* ekverkis rimarkinda poetino, kiu aktivis ĉefe traduke: temas pri *Magda Carlsson* (1896-1971),

instruistino. Ŝi lernis Esperanton en 1931. Ŝiaj malmultaj originalaĵoj estas veraj artismaj juveloj.

El la tiamaj *anglodevenaj* poetoj, kvar estis forte influitaj de la Budapeŝta Skolo. Unu el ili estis *Leonard Newell* (1902-1968), Anglo, kiu kunlaboris al *Literatura Mondo, Heroldo de Esperanto, La Nica Literatura Revuo, Norda Prismo.* Li estis bona tradukisto kaj elstara novelisto. Poezie li verkis malmulte. En *12 Poetoj,* 1934, aperis kelkaj liaj fajne cizelitaj poemoj ironiaj, kaj kanzonaj poeziaĵoj. En la sama *Dekdu Poetoj* aperis ankaŭ la originalaj poemoj de la angla misiisto *Brian Price-Heywood* (1910-1942), kiu kunlaboris en *Literatura Mondo,* kaj de la usona *Ezra Clark Stillman* (1907-), eksmembro de la direktoraro de IALA (The International Auxiliary Language Association).

Elegante spritajn poemetojn aperigis *Wilfred Bickley Johnson* (1903-), instruisto, kunlaboranto de *Literatura Mondo.* La malgranda kolekto de Geoffrey D. Nash (1882-1931), *Miniaturoj,* aperis en 1931, kaj *Versaĵoj de JoE,* de Joab Eljot, aperis en 1946. Li estis la aŭtoro de fantazia strangaĵo: *Per turboj bontonaj en Kakofonujo,* 1938 (2-a eld. 1951).

De la *flandra* oficisto *Jan van Schoor* (1896-1955) aperis en 1928 la poemkolekto *Amo kaj Poezio,* aldone al multaj valoraj tradukoj. Van Schoor estis poeto minortona, delikatsenta, kun intimeca, kaj ofte iom pudora inspiro.

Ankaŭ en la *germanlingvaj landoj* efikis la hungara influo. La Sviso *Karl Jost* (1876-1952) aperigis siajn originalajn poemojn, kiuj tamen nur tie kaj tie superas la unuaperiodan nivelon, en *Modesta Bukedo,* 1948. De la Aŭstro *Alfred Schauhuber* (1896-), oficisto, aperis poemoj melankolitonaj, kun milda inspiro, en *Dekdu Poetoj,* 1934. Samkolekte aperis kelkaj poemoj de la aŭstria verkisto *Nikolao Hovorka* (1901-1966). En la pli posta kolekto *Naŭ Poetoj,* 1938, aperis la verkoj de la sudeta Germano *Martin Strümpfel* (m. 1939), naturinspirita poeto. Samkolekte aperis la verkoj de la Germano *Karl Vanselow* (1877-1959), kiu aktivis abunde ankaŭ traduke. En 1952-1953 aperis la ses kajeroj de lia kolekto *Nia Lingvo Esperanto.* Minortona poeto estas la Germano *Herbert Hesse,* kies *Sonoj Novaj kaj Malnovaj* aperis en 1930. Sed la plej interesa poeto estas la germandevena ĵurnalisto, eldonisto, tradukisto, lingvisto kaj prozisto *Teo Jung* (1892-). Lia lingvo estas zorge flegata, kun altaj lirikaj pretendoj: li sukcesis evoluigi propran stilon, kiu tamen esence dependas de la budapeŝta literatura revolucio. Liaj poemoj aperis en *La Alta Kanto de la Amo* (poemo bazita sur legendo, 1926, 2-a eld. 1928) kaj en la poemaro *Ek al Batal',* 1935.

Du *Nederlandanoj* estas aparte interesaj: la lirika poeto *Adalbert*

Smit, kies poemoj aperis en la kolektoj *Fajreroj*, 1927, kaj *Roseroj*, 1930, kaj la havenlaboristo *Lodewijk Cornelis Deij* (1919-). La poemoj de ĉi-lasta poeto estas stile variaj kaj sinceretose vigle antifaŝismaj: ili aperis dummilite en pluraj revuoj, kaj tio igas nin bedaŭri, ke lia poezia sezono daŭris tiel mallonge.

(c) *Latinidaj poetoj:* De la *rumana* presisto *Miŝu Beraru* (1903-1938), esperantisto ekde 1925, kunlaborinto al *Literatura Mondo*, aperis la poemaro *Spite la Vivon*, 1928, kun neprofundtonaj, tamen sinceraj, sufiĉe variritmaj poemoj, kun mezgaja inspiro.

En *Francio* aperis ankaŭ pluraj poetoj. Unu el ili estis la „Panamano" (fakte pariza poeto) *Georgo E. Maura* (1905-1971), kiu verŝajne estas pseŭdonimo de franca aŭtoro. Siajn unuajn verkojn li aperigis en *Dekdu Poetoj*, 1934, en *Literatura Mondo*, en la poemkolekto *Duonvoĉe*, 1939 (2-a eldono ampleksigita en 1963) kaj en *La Nica Literatura Revuo*. Maura estas rafinita poeto, kiu diboĉe uzas la rimajn kaj ritmajn eblecojn de la lingvo, kun eleganta, kristale fajna lingvo-uzo kaj plena ellaboriteco de la konceptoj. Li verkis pri amo, nokto, pri momentoj kaj rememoroj, sed ankaŭ pri tuthomaraj problemoj, kiel milito, liberiĝo, sufero.

Menciindaj estas la originalaj poemoj de *Gaston Waringhien* (1901-), de *Henri Vatré* kaj de *Juliette Baudin-Vatré* (1910-1937), tro frue mortinta, kies versoj aperis en *Naŭ Poetoj*, 1938.

Du poetoj aktivis en *Italio*. Unu estis *Alessandro Mazzolini* (1857-1934), kies poemoj, aperintaj en *Esperanto, Literatura Mondo, Ondo de Daŭgava*, tamen resentigas ankoraŭ la unuaperiodan neflegitecon kaj diletantecon. La dua poeto estis la bibliotekisto *Francesco Pizzi* (1880-1946). Liaj poemoj aperis en 1925 en *En la Mondon Venis Nova Sento*. Lia poemo *La Protektanto* estis publikigita en 1932. Li estis religitendenca, minortona poeto, tamen multaspekte interesa.

La *hispanaj* kaj la *katalunaj* poetoj formas kvazaŭ apartan skolon interne de la granda hungara poezia reformo. Tamen, la plej fruaj reprezentantoj de ĉi tiu skolo stile spegulas ankoraŭ la unuaperiodan stilsituacion. De la respublikana stabkolonelo *Fernando Redondo-Ituarte* (1882-1949) aperis originalaj poemoj strikte ligitaj al la stilo de la unuatempa skolo. La samon ni povas diri pri la Kataluno *Arturo Domènech-i-Mas* (1878-1936), instruisto, socialisto, premiita ĉe la Floraj Ludoj. Liaj *Poemoj* (redaktitaj de J. Grau-Casas) aperis en 1937.

Pli stilmaturaj estas la poeziaj verkoj de *Julio Mangada-Rosenörn* (1877-1946), kies *Versaĵaro*, kun 14 poemoj, aperis en 1923. Pli poste, en 1933, aperis lia alia originala poemaro *Amelia kaj Marina*. Interesaj estas ankaŭ la poemoj de la hispana kuracisto *Rafael de San-Millán-Alonso* (1866-1924). Liaj poemoj, ne tiel flegitaj kiel tiuj

de Mangada, do stile ankoraŭ iom primitivaj, kaj ofte kun ne plene ellaborita enhavo, troviĝas en *Tri Rakontoj kaj Kelkaj Versaĵoj*, 1914, kaj en *Mia Poezio*, 1932. Aperis ankaŭ poemo: *Ŝipopereo*, 1921.

Pli rekte influita de la Budapeŝta Skolo estas la hispana telegrafistino *Amalia Núñez-Dubús* (1899-), kies poemoj aperis en *Dekdu Poetoj*, 1934, kaj kies verse reverkita navarra legendo, *Eterneco*, aperis en 1966. Ŝi estas freŝtona, facilesprima poetino, kun multvaria temogamo.

Alia rekta — kaj eminenta — ido de la Budapeŝta Skolo estas la kataluna urbestra sekretario *Jaume Grau-Casas* (1896-1951), kiu multe kaj kompetente tradukis, kunlaboris en *Literatura Mondo*, *Heroldo de Esperanto*, *Kataluna Esperantisto*, kaj verkis romantikajn poemojn, kun partoj de granda sincereco lirika kaj emociveka inspiro. Liaj versaĵoj aperis en *Amaj Poemoj*, 1924, *Novaj Amaj Poemoj*, 1927, kaj en *La Lasta Poemo*, 1936.

(ĉ) *Slavaj poetoj:* En *Sovetio* multaj proletaj verkistoj estis stile influataj de la hungara reformo. Sed nur du estas veraj idoj de la Budapeŝta Skolo: la Leningradano *Grindel Falkonbriĝ*, kiu kunlaboris en *Literatura Mondo*, kaj la Sovetiano *V. G. Sutkovoj*. Ambaŭ estas reprezentataj per malmultaj verkoj en *Naŭ Poetoj*, 1938.

En *Pollando* aperis pluraj poetoj, el kiuj neniu tamen estis aparte elstara. Plej interesa estas *Salo Kornfeld* (ps. Grenkamp, 1896-1943). Liaj originalaj poemoj aperis en *Krioj de l'Koro*, 1922. De *Kaplan* aperis la poemkolekto *Akordoj Esperantaj*, 1923. Fine, originalajn poemojn publikigis ankaŭ *Edward Wiesenfeld* (1892-1941?), kiu multe tradukis kaj estis premiita ĉe la Floraj Ludoj.

Kontraŭe, altan nivelon atingis la originalpoezia verkado en *Ĉeĥoslovakio*. La originalaj poemoj (ĉefe humurtonaj) de *Tomáš Pumpr* (1906-1972), juristo kaj esperantisto ekde 1926, aperis ĉefe en *Literatura Mondo*. Pumpr estas konata precipe pro siaj multaj elĉeĥigitaj verkoj, i.a. pro la traduko de operoj (de Smetana, Dvořák, Blodek). Alia poeto originala estis la profesoro Miloš Lukáš (1893-), esperantisto ekde 1907. Li multe tradukis, kaj kunlaboris en *Literatura Mondo*, *La Nica Literatura Revuo*, ktp. En 1937 aperis poemoj de *Vlada Hvězdenský*.

Dum ĉi tiu periodo ni vidas ankaŭ la ekformiĝon de aparta poezia skolo en *Jugoslavio*. La Sloveno *Damjan Vahen-Svetinov* (1913-) eldonis kvar poemkolektojn: *Miaj Vojoj*, 1938; *Dum Longaj Vesperoj*, 1940; *Dum Noktoj Senstelaj*, 1941; *Krioj el Mallumo*, 1963. De la slovena juristo *Jakob Stefančić* (1885-) aperis pluraj poemoj. Grava estas lia prilaboro, en formo de seskanta poemo, de la novelo *La Servulo Jernej kaj Lia Rajto* de la slovena verkisto Ivan Cankar (1933).

Krome, publikigis originalajn poemojn la Serbo *Stevan Živanović* (1900-1938), pli fama kiel prozisto, la Kroato *Franjo Homar* (1905-1933), la serba pastro *Milivoje Pavlović* (1907-), la kroata ĵurnalisto *Đuro Rašan* (1912-), kiu verkis ankaŭ kroate. Ni citu laste la sonetciklon de *Sv. Petrović* (1899-1960), *Sonetkrono por la Esperantistaro.*

Ne forgesendas la pli malproksimaj slavdevenaj poetoj. La plej eminenta estas *J. J. Kohen-Cedek* (1904-), ruslanda Hebreo, nun Israelano, instruisto. Li kunlaboris en *Heroldo de Esperanto, Malgranda Revuo,* k.a. Lia poemaro troviĝas, almenaŭ parte, en *Tiberio,* 1942. Li estas ironie bonintenca poeto, kiu ĝuige pikas per leĝertonaj versoj.

Alia poeto estis la pola Hebreo, poste Israelano *Imanuel Olŝvanger* (1888-1961), oratoro, cionista aktivulo. Liaj poemoj aperis en *Eterna Sopiro,* 1925 (pligrandigita eldono en 1942). Li estas emocia poeto, kelkfoje kun momentoj de brila lirikeco. La dua eldono de lia verko prezentas ampleksan poemon: *Inter Homo kaj Dio.*

(d) *Ekstereŭropaj poetoj:* De la Ĉino *Saint-Jules Zee* (aŭ Sü) aperis fantazivibraj, etjuvele buntaj originalaj poemoj en *Naŭ Poetoj,* 1938. Li multe tradukis el la moderna ĉina literaturo. En Brazilo aperis la iom primitiva *Ama Stelaro* de *Nuno Baena* (m. 1922), en 1922, kaj la pli matura poemaro originala de *Francisco Valdomiro Lorenz* (1872-1957), esperantisto ekde 1887. Liaj poemoj originalaj aperis en *Diverskolora Bukedeto,* 1941 (kun tradukaĵoj). Lia traduka ĉefverko estas la *Bhagavad-Gîtâ.*

(e) *Komunaj verkoj de poetoj de la Budapeŝta Skolo:* De K. Kalocsay kaj J. Baghy aperis antologioj en *Arĝenta Duopo,* dua volumo, 1937, kaj en *Ora Duopo,* 1966.

El literaturaj promesoj realiĝis du reprezentaj volumoj:

La unua estas *Dekdu Poetoj,* 1934, kun poemoj de Adamson (Estono), Hilda Dresen (Estonino), Brian Price-Heywood (Anglo), Hovorka (Aŭstro), Kurzens (Latvo), Maura (Franco?), Newell (Anglo), Núñez-Dubús (Hispanino), Schauhuber (Aŭstro), Stillman (Usonano), Szilágyi (Hungaro), Tárkony (Hungaro).

La dua estas *Naŭ Poetoj,* 1938, kun verkoj de Sutkovoj (Sovetiano), Jevsejeva (Latvino), Falkonbriĝ (Sovetiano), Ĉulitis (Latvo), Zee (Ĉino), Vanselow (Germano), Strümpfel (Germano), Sieroszewski (Polo), J. Baudin-Vatré (Francino).

6.7.1.3 *Soveta kaj Proleta Skolo.* — La eksplodo de la Oktobra Revolucio kaj la postmilita kresko de proletaj revoluciaj movadoj en preskaŭ ĉiuj ekonomie evoluintaj ŝtatoj de la mondo kreis grandegan entuziasmon ankaŭ ĉe multaj poetoj, kiuj provis esprimi tion en siaj verkoj.



Literatura grupo de sovetaj esperantistoj (de maldekstre): G.P.Demidjuk, V.I.Polakov, E.O.Miñalski, S.A.Rublov kaj N.V.Nekrasov.



L.Tárkony: Forma perfekteco kaj senpera lirika esprimo.

La plej granda estas sendube la rusa instruisto *Eŭgeno Miñalski* (1897-1937), kiu lernis Esperanton en 1911. Li fondis en 1917 literaturan revuon en Saratov: *Libera Torento.* Liaj originalaj poemoj aperis libroforme en *Unua Ondo,* 1918; *Du Poemoj,* 1922; *Prologo,* 1929; *Fajro Kuracas,* 1932; *Kantoj de l'Amo kaj Sopiro,* 1934. Bedaŭrinde pluraj gravaj originalaj manuskriptoj perdiĝis (i.a.: restas nur fragmentoj de la poemo *Reforĝo de l'Homo,* pretigita inter 1934-1935, kiu havis 5000 versojn). La unue aperinta verko de Miñalski tuj montris eksterordinaran teknikan kaj lingvan maturecon. Li estis fajrospruca poeto, impulsema, arda. Liaj versoj per aŭdacaj ritmosanĝoj substrekas la disvolviĝon de lia inspiro. En sia lasta verko li turniĝis al klasbatalaj temoj: tio ankoraŭ pliampleksigis lian jam vastan temogamon.

La rusa ekonomikisto *Nikolaj Hohlov* (1891-1953) lernis Esperanton en 1905. Li tradukis multe, ĉefe el Drozdov, Dorosevič kaj Tolstoj. Li verkis ankaŭ senpretendan, amuzan teatraĵeton. Originalaj poemoj aperis en *Literatura Mondo* kaj en *La Tajdo,* 1928. Ĉi tiu poeto, forte influita de la Budapeŝta Skolo, estas eleganta artisto, kun intima sento pri la versa muziko kaj kun la kapablo atingi lingvan harmonion en bele cizelitaj versoj.

Alia poeto estis la rusa ĵurnalisto *Nikolaj Vladimiroviĉ Nekrasov,* kiu naskiĝis en 1900 kaj mortis dum la Dua Mondmilito. Li multe kaj kompetente tradukis. Originale li ne estis fekunda verkisto. Liaj verkoj aperis dise en Esperantaj periodaĵoj. Lin karakterizas la influo de la rusaj simbolistaj poetoj.

Ankaŭ la bulgara ĵurnalisto *Asen Grigorov* (ps. Marin Ljubin; 1903-), redaktoro de *Internacia Kulturo* (1945-1949), eminenta tradukanto, aperigis rimarkindajn originalajn poemojn, kie li simpatie kaj kunsufere priskribas la vivsituacion de la laborista klaso. Liaj poemoj troviĝas en *Ruĝa Aŭroro,* 1930 (2-a eld. 1932) kaj en *Garbo,* 1930. Li verkis ankaŭ originalajn novelojn.

Teknike multe malsuperaj estas la versaĵoj de alia Bulgaro, Ĥ. M. Ĥrima. Ili aperis en *Poemoj de l' Plugisto,* 1930, kie la aŭtoro, iom patose, esprimas siajn politikajn sentojn kaj sopirojn.

Originalaj poemoj de *Eugeniusz Matkowski* (antaŭe: Matwiejczuk), Ukrajnano, nun pollanda ŝtatano, muzikisto, aperis en *Pola Esperantisto, Ek!, Norda Prismo, Oomoto,* k.a. Libroforme liaj versaĵoj aperis en *Poemoj,* 1960. Li estas poeto teknike ligita al la unua periodo de Esperanto, ofte tro patosa, sed kelkfoje kun indigne sinceraj eksplodoj.

Delikatajn klaskonsciajn poemojn verkis ankaŭ la sarlanda karbministo *Josef Burger* (1881-1970), kiu esperantistiĝis en 1913.

Li kunlaboris precipe en la laboristaj gazetoj, kaj post 1933 forlasis Germanion.

Ankaŭ de la rusa blinda poeto *Vasilij Eroŝenko* (1890-1952) aperis kelkaj originalaj versaĵoj, ĉefe en *Ĝemo de Unu Soleca Animo*, 1923, kaj dise, en gazetoj esperantistaj rusaj kaj japanaj. El liaj poemoj, nur kelkaj superas la nivelon de simpla emocia esprimaĵo kaj atingas la nivelon de komplete ellaborita lirika poemo. Li verkis ankaŭ novelojn.

6.7.1.4 *Japana Skolo.* — En Japanio esperantistoj ekzistis jam antaŭ la Unua Mondmilito, sed la lingvo fortike enradikiĝis nur intermilite. En ĉi tiu periodo prepariĝis la ekfloro de pure Japana Skolo: temas pri verkistoj pri lingvaj problemoj, pri sciencistoj, pri ĵurnalistoj, pri lertaj tradukistoj kaj pri originalesperantaj beletristoj. Dank' al la laboro de la Budapeŝta Skolo, ili trovis en Esperanto poluritan lingvon kaj riĉan vortaron; la poetikon ili nur parte akceptis, kaj pluformis laŭ propraj bezonoj, en la spirito de la japanaj tradicio kaj sentemeco.

La du plej eminentaj originalaj poetoj de la Japana Skolo (unua generacio) estas Ossaka kenĵi kaj Ito saburo.

Ossaka kenĵi (1888-1969), fervoja inĝeniero, aktiva ankaŭ sur movada kaj lingvesplora kampoj, kompetenta tradukinto el la klasika japana literaturo kaj poezio, verkis kelkajn originalajn poemojn, kiuj aperis ĉefe en revuoj kaj en lia verko *Perloj el la Oriento* (1921), kune kun liaj tradukaĵoj. Li estas poeto de momentaj natureventoj, de subitaj, intuiciaj perceptoj, esprimataj en lingvo afekcie resuma, kie ĉiu vorto estas nemalhavebla ero de la mozaika tuto. Plej laste aperis liaj originalaĵoj, apud tradukaĵoj, en *El Orienta Florbedo*, 1956, parte represo el lia verko de 1921.

La pedagogo *Ito saburo* (1902-1969), proleta verkisto kaj aktivulo, ellernis Esperanton en 1916. Li verkis ankaŭ plurajn prilingvajn kaj primovadajn eseojn kaj studojn. Liaj originalaj poemoj, kiujn karakterizas aparta melankolia kaj naturkontempla etoso, aperis dise, ĉefe en revuoj kaj, kun tradukaĵoj, en *Verda Parnaso*, 1932.

Ĉi-periode ne mankas originalaj japanaj poetoj, inter kiuj *Hattori tôru* (1911-1944?), kiu ankaŭ tradukis; *Kanamatu kenryô* (1915-); *Mijake ŝihej* (1901-), kiu aktivis ankaŭ traduke kaj sur lingva kampo; *Onoda yukio* (?-1945), kiu verkis ankaŭ prilingvajn eseojn.

En 1956 aperis *Edelvejso*, poemkolekto de *Nisimura masao* (1907-1940), kiu estis preta jam en 1938. Nisimura estas poeto teknike iom kruda, kiun ni tamen legas kun respekto pro lia malfacila kaj nobla vivo.

Poemojn originalajn verkis ankaŭ *Taĉibana kenĵi* (1903-), espe-

rantisto ekde 1923. Liaj verkoj troviĝas dise en revuoj. Li kompetente tradukis.

6.7.1.5 *Satiraj Poetoj.* — Apartan pritrakton meritas la franca bankdirektoro *Raymond Schwartz* (1894-1973), kiu estis kunlaboranto de *Literatura Mondo, Franca Esperantisto, La Nica Literatura Revuo, Sennacieca Revuo,* kaj redaktoro de la satira gazeto *La Pirato* (1933-1935). Lia lingvo plene eluzas la vortludajn latentojn de Esperanto, konsistantajn el dusencaj esprimaĵoj, komikaj pseŭdo-sufiksado kaj sinonimado: li lerte ĵonglis per la lingva materialo, kiun li kapablis sprite vivigi. Li verkis ironiajn kaj satirajn poemojn pri hipokrituloj, pri komikaj viv-situacioj kaj satiraĵojn pri la politikaj okazaĵoj kaj pri la Esperanto-Movado mem. Li verkis multe ankaŭ proze. Liaj poemoj aperis libroforme en *Verdkata Testamento,* 1926 (2-a eld. 1930); *La Stranga Butiko,* 1931; *La Ĝoja Podio,* 1949.

En 1927 aperis krome verketo de la Dano N. Liventhal: *Esperantio ... ĉefe en Danio,* kun epigramecaj satirpoemetoj.

6.7.1.6 *Poetoj Izolitaj.* — Estas fenomeno tre konata, ke, ĉie en la mondo, ekzistas esperantlingvaj poetoj, kies verkoj tamen nenie aperas: iliaj poemoj restas en tirkestoj, aŭ legiĝas en la grupo: estas ofte bonŝanca hazardo, se ili aperas en iu periodaĵo.

Unu el la plej eminentaj ekzemploj de tiuj silentaj poetoj estas la itala monaĥo *Giovanni Ricci* (1875-1941), misiisto en Ĉinio. En 1926 li finis grandan poemon, kun versnombro, kiu egalas tiun de la *Dia Komedio.* Temas pri la poemo *Uranogedio,* kiu poezi-filozofie prilumas la simbole priskribitan lukton inter la Bono kaj la Malbono. Nun tiu monumenta verko, signifa pruvo pri la grandeco de sia aŭtoro, kaj pri la valoro de la lingvo, kiu kapablis inspiri tian kreaĵon, troviĝas en IEMW (Internacia Esperanto-Muzeo Wien).

Alia ekzemplo estas la fama ĝeneva profesoro pri psikologio *Charles Baudouin,* kiu penetrigis en la franclingvajn landojn la psikologion de Carl Gustav Jung. Liaj poemoj, sincertonaj, personstilaj korelversoj, aperis nur sporade, kaj estas praktike nekonataj.


6.7.2 Prozo

6.7.2.1 *La Budapeŝta Skolo.* — La lingva revolucio de la Budapeŝta Skolo efikis ankaŭ en la prozo. Oni evoluigis stilon elegantan, sed personan, dank' al la malsamaj stilgamoj, pri kiuj oni disponis. Oni evitis pezajn kunmetaĵojn, tro longajn esprimojn. Ĉi-periode elstaras la noveloj de tri aŭtoroj: du hungaraj kaj unu angla: Julio Baghy, Ferenc Szilágyi kaj L. N. M. Newell.

Julio Baghy aperigis siajn novelojn en *Dancu Marionetoj!,* 1927; *Migranta Plumo,* 1929; *Verdaj Donkiĥotoj* (kun unu romaneto),




De Paĝo al Paĝo (1932) portretis la ĉefajn verkistojn, kiuj aktivis en la Budapeŝta Skolo kaj ĉirkaŭ ĝia *Literatura Mondo*.



Julio Baghy ankaŭ en siaj prozaj verkoj lirike interpretis sian fundamentan homecon.





Inter la prozaj verkoj de la Dua Periodo lingve elstaris tiuj de F.Szilágyi, dum la fikciaĵojn de J.Forge karakterizis belstila leĝereco.

1933; *La Teatra Korbo,* 1934, kaj en *Koloroj,* 1960 (tamen konsistanta nur el jam aperintaj). La noveloj kaj rakontoj de Baghy neniam havas tre komplikan framon: ofte ili pli similas al skizoj. Lia tongamo iras de plej milda trankvilo, kun ia kompata sento por la homaj febloj, ĝis plej satira karikaturo, kie la aŭtoro grimace prezentas la maljuston kaj la hipokritecon, kaj atingas la momenton de etike pravigita fajra eksplodo. Tre ŝatataj estas ankaŭ liaj romanoj: *Viktimoj,* 1925 (2-a eld. 1930) kaj *Sur Sanga Tero,* 1933, ambaŭ pri lia siberia militkaptiteco, estas liaj ĉefverkoj. Ili reaperis unuvolume en 1971. Malpli sukcesa estas la socikritika, satira kaj moroskurĝa romano *Hura!,* 1930. Baghy skribis daŭrigon de tiu romano, *Insulo de Espero,* dummilite malaperintan. La romano *Printempo en la Aŭtuno,* 1931, estas eble iom tro sentimentalece patosa, tamen malkovras la manon de majstro, kiu kompetente ĉizis la psikologion de la rolantoj.

De *Ferenc Szilágyi* aperis multaj prozaj tradukaĵoj el la hungara kaj el la sveda. Liaj originalaj noveloj aperis libroforme en *Trans la Fabeloceano,* 1931 (2-a eld. 1972), unua provo de pli poste tre evoluinta majstro, en *La Granda Aventuro,* 1945; *Inter Sudo kaj Nordo,* 1950; *Koko Krias jam!,* 1955. Krome, kelkaj verkoj aperis en kvin rapsodioj (kolektoj de prozo kaj poezio originala kaj traduka) aperintaj inter 1943 kaj 1953. Aperis ankaŭ kriminalromaneto: *Tiel Okazis, aŭ Mistero Minora,* 1958, kiu, lingve elstara, kaj atentokatena, plej superas la meznivelon de tiaspecaj verkoj.

Szilágyi estas realisto: liaj noveloj fontas el la ĉiutaga vivo, kaj ĝenerale sekvas ties preskribitajn vojojn. Sed kelkfoje ne okazas tiel, kaj, jen, por momento la kutima vivo estas forgesita, kaj novaj esperoj kaj spertoj transformas la rolanton. La lingvo de Szilágyi estas esenca, nerva, mallonga, kaj respegulas lian realismon.

De *Teodoro Ŝvarc* (1894-1968) aperis du romanoj: *Modernaj Robinzonoj,* 1923, pri la fuĝo el siberia militkaptitejo, kaj *Maskerado ĉirkaŭ la Morto,* 1965, kortuŝa sed simpla kaj ekzemple malpatosa romano aŭtobiografia pri la eskapo de Judo antaŭ la naziaj kaj faŝistaj persekutantoj en Hungario.

Maria kaj la Grupo, 1936, estas originala romano de *Imre Baranyai.* Ĝi pritraktas la internan vivon de Esperanto-grupo, kiun li vidas per intimisma, psikologia maniero. Supozeble temas pri aŭtobiografio.

En la tiama Hungario aperis aliaj verkistoj, kiuj tamen aktivis nur sur traduka kampo, sed malgraŭ tio profunde influis la starigon de prozostilo efika kaj gamkompleta. Unu el la plej eminentaj estis *Károly Bodó* (1903-1963), redaktinto de *Literatura Mondo,* kiu tradukis el Karinthy, Babits, kaj novelojn por *Hungara Antologio.*

6.7.2.2 *Prozverkistoj ĉirkaŭ la Budapeŝta Skolo.* — Unu el la plej eminentaj novelistoj nehungaraj estas sendube la Anglo *Leonard N. M. Newell.* Lia novelaro *Bakŝiŝ* aperis en 1938. Temas pri egiptofonaj noveloj, rakontitaj kun granda konvinko. Liaj koloroj estas helaj, lia sinteno seniluzia, socie objektiva, sed kompata.

Eminenta estis ankaŭ la Franco *Raymond Schwartz,* kiu verkis la romaneton *Anni kaj Montmartre,* 1930, ekvilibra, malemfaza rakonto, lingve kaj psikologie trafa, pri la misaventuroj de germana knabino en Parizo. En 1963 aperis lia granda romano *Kiel Akvo de l' Rivero.* Temas pri famili-generacia romano, parte aŭtobiografia, kiu, krom la tria parto, iom tro haste verkita, prezentas trafan analizon de karakteroj kaj sinsekvon de eventoj. Lia rakonto estas tute kredebla, lia partopreno estas varma kaj simpatiplena. Tiu verko prezentas sian aŭtoron kiel maturan verkiston, trafe observokapablan. Novelaro el 1920-70 aperis en la volumo *Vole... Novele,* 1971.

El la novelistoj elstaras ankaŭ la pola filmreĝisoro *Jan Fethke* (ps. Jean Forge, 1903-), kiu lernis Esperanton en 1910. Liaj unuaj romanoj, *Abismoj,* 1923; *Saltego trans Jarmiloj,* 1924; kaj *Mr. Tot Aĉetas mil Okulojn,* 1931, estas ekzemploj de inventa riĉeco, de amuza, ripoziga kaj fantaziinstiga verkado. Psikologie, liaj tipoj estas ne ĉiam kredeblaj, kaj cetere ili estas nur skizitaj. Liaj temoj estas fikciaj, kaj ne trovas korespondon en la realaĵo. Iom leĝeraj, kvankam belstilaj, estas liaj noveloj en *La Verda Raketo,* 1961. Ĉi tiuj noveloj, satiraĵoj pri kelkaj tipoj (cetere, parte neversajnaj), estas kelkfoje iom tro karikaturaj, sed kelkfoje sprite trafaj.

Aparte interesaj estas ankoraŭ du verkistoj: K. R. C. Sturmer kaj S. Engholm. La angla dentoteknikisto *Kenelm Ralph Creuzé Sturmer* (1903-1960), konata ankaŭ sub la pseŭdonimo *Kenelm Robinson,* lernis Esperanton en 1922. Li verkis la romanskizon *Por Recenzo...!,* 1930, la pensokolekton *El la Notlibro de Praktika Esperantisto,* 1934, kaj, sub sia pseŭdonimo, la novelarojn *Se Grenereto...,* 1930, kaj *Vol. II,* 1931. Li estis verisma verkisto, kun humuro kaj, sub tre trankvila surfaco, kun bolanta sensemo, al kiu li aludis komprenige dank' al sia artisma sentemo kaj psikologia analizkapablo.

La sveda instruisto *Stellan Engholm* (1899-1960), esperantisto ekde 1927, verkis multe ankaŭ traduke. Li redaktis la literaturan periodaĵon *Malgranda Revuo* (1943-1952). Liaj romanoj estas *Al Torento,* 1930 (2-a eld. 1934); *Homoj sur la Tero,* 1931 (2-a eld. 1963); *Infanoj en Torento:* unua volumo 1934 (2-a eld. 1946), dua volumo 1939; *Vivo Vokas,* 1946. Li verkis ankaŭ du novelojn, aperintajn en 1943: *Maljunulo Migras* kaj *Venĝo.* Li estis realisma verkisto de kampara medio, kiun li analizas per koloroj helaj kaj preskaŭ sentempaj. Brilas en liaj verkoj sobra humanisma idealismo.

De la Rumano *Tiberio Morariu* aperis la novelaro *Sub la Stelo,* 1951; la Estono *Hendrik Adamson* publikigis *Auli,* 1934, novelon pri kampara medio; la Dano *Peter Theodor Justesen* (1875-1950), kuracisto, verkis kelkajn novelojn, ĉefe en *Malgranda Revuo;* de la Germano *Teo Jung* aperis la originala romano *Landoj de l'Fantazio,* 1927, kun utopieca temo, kaj la verko *Gudrun,* parafrazo de la antikva germana eposo, 1928.

Ankaŭ kelkaj Francoj verkis proze en Esperanto: eminenta estas *Georges Avril* (ps. de Georges de Courmont, 1874-1952), profesia ĉefredaktoro. Liaj noveloj aperis ĉefe en *Nia Gazeto,* 1934-1938. Originalajn prozaĵojn verkis ankaŭ *Jean Delor* (1905-1955), pli konata kiel tradukanto. Libroforme aperis la novelaroj de *Joël Thézard: Polusaj Glacioj sub Noktmeza Suno,* 1937, kaj samjare, *Nordnordaj Fabeloj.*

La hispana kuracisto *Rafael de San-Millán-Alonso* eldonis *Tri Rakontoj kaj Kelkaj Versaĵoj,* 1914, kaj de lia samlandano *Julio Mangada-Rosenörn* venis la rakonto *Ferdinando VI kaj Farinelli,* 1921.

De la Polo *Salo Kornfeld* (ps. Grenkamp) aperis la penskolekto *Penseroj* en 1922 (2-a eld. 1924) kaj la malgranda novelaro *5.000.000,* 1931.

La Ĉeĥo *Vl. Brejnik* verkis *Tri Rakontetoj,* 1923; de la Sloveno *Franjo Modrijan* aperis la simple mistika verketo *Fabeloj,* 1930. De la Slavo loĝanta en Turkio *St. Misak* eldoniĝis la rakonto *Malgranda Adamo,* 1934.

La Bengalo *Lakshmiswar Sinha* (1905-) aŭtoris plurajn verkojn kaj plurajn tradukaĵojn. Aŭtobiografia estas la libro *Jaroj sur la Tero,* 1966.

Interesaj estas la jenaj romanverkintoj: unu Serbo kaj du anglalingvanoj. La Serbo *Stevan Živanović* (1900-1938) verkis vortaron, rakontojn *(La Mizeruloj,* 1922; *Bela kaj Stela,* 1925; *La Diino de la Maro,* 1926) kaj originalajn poemojn. Lia plej konata verko estas la romano *La Sonorilo de Bled,* kiu aperis en 1959, sed estis preta jam de multaj jaroj. Ĝi iom suferas pro la aliiĝo de la epoko, de la moroj kaj gustoj. De la Anglo *Douglas P. Boatman* (1892-) aperis en 1928 la novelo *Kaprico* kaj en 1932 la originala policromano *La Nekonata Konato.* Li verkis ankaŭ poemojn. La usona pianfabrikisto Edward Payson (1842-1932), kiu abunde aktivis traduke, eldonis la romanon *Juneco kaj Amo,* 1929, kaj la rakonton *La Fantoma Edzino* (kun alia policnovelo originala) en 1936.

6.7.2.3 *Japanaj Prozaŭtoroj.* — De *Tabata kisaku* (1911-) aperis pluraj originalaj noveloj kaj dramoj. *Nakagaki koĵiro* (1894-1971), aktivulo, verkisto kaj pentristo, aperigis tradukaĵojn, prilingvajn

verkojn kaj sociverismajn novelojn. Ankaŭ la Japanino *Hasegaŭa teru* (1912-1946) rakontis siajn spertojn kaj laborojn en multaj leteroj, kaj en la verkoj *Flustr' el Uragano* kaj *En Ĉinio Batalanta*. Ŝi estis komunistino, kaj partoprenis flanke de la ĉinaj proletoj la naciliberigan (kontraŭjapanan) kaj kontraŭguomindangan militojn.

6.7.2.4 *Ĝermana Proza Skolo.* — Fine de la unua literatura periodo, kaj preskaŭ dum la tuta dua periodo aktivis en kelkaj ĝermanlingvaj landoj prozistoj sufiĉe abundverkaj, kiujn ne tre influis la tiama Budapeŝta Skolo. Kvankam pluraj el ili tute ne estis lingvaj diletantoj, ili tamen ne sekvis la hungaran ekzemplon, kaj preferis atenti la heredaĵon de la antaŭmilitaj prozverkistoj.

Plej eminenta literature kaj lingve estas sendube la Nederlandano *Hindrik J. Bulthuis* (1865-1945), kiu lernis Esperanton en 1901. Li verkis ankaŭ teatraĵojn kaj originalajn poemojn (en *La du Ŝipoj*, 1909). Sed plej valorajn laŭrojn li rikoltis en la tradukado kaj en la romanverkado: *Jozef kaj la Edzino de Potifar (Idoj de Merkuro)*, 1926; *Idoj de Orfeo*, 1923; *La Vila Mano*, 1928; kaj *Inferio*, 1938. Liaj plej bonaj verkoj pritraktas la tradician vivon de la nederlandaj kamparanoj, kiujn li observas per verismaj, psikologiinterpretaj kaj amikaj okuloj. Kelkfoje, kiam li volas trospici sian rakontkampon per neeblaj hazardokazaĵoj, lia sugestia forto malgrandiĝas, kaj la rakonto iĝas iom plumpe nekredebla. Sed kie li, kiel en *La Vila Mano*, preskaŭ nur pritraktas la kamparanajn vivon kaj psikologion, li sukcesas verki siajn plej valorajn paĝojn. Lia lasta romano (1938) estas utopi-fikcia, parte ankaŭ kritika verko, psikologie kaj rakontframe neverŝajna.

Abunde verkis originale ankaŭ la germandevena Anglo *Heinrich Luyken* (1864-1940). Liaj romanoj estas *Paŭlo Debenham*, 1911; *Mirinda Amo*, 1913; *Stranga Heredaĵo*, 1922; *Pro Iŝtar*, 1924. Li plektis neverŝajnajn kaj altpatosajn aventurojn kun religitendencaj temoj. Lia psikologio estas primitiva, kaj lia rakontmaniero eksmode romantika. Tiuj difektoj iom malakriĝas en la romanoj de 1913 kaj de 1924, el kiuj tiu lasta (1924) estas lia plej ambicia verko: pri la lukto inter la bono kaj la malbono en la antikva Babilono.

Du originalajn romanetojn verkis la Anglo *John Merchant* (1872-1936): *Tri Angloj Alilande*, 1912 (4-a eld. 1936), kaj *Kompatinda Klem*, 1931. Temas pri ĉarmaj rakontoj sen literatura valoro.

La Germano *Fr. Ellersiek* (ps. Argus, 1880-1959) eldonis la kriminalromanon *Pro Kio?* en 1920. De la Germano *Richard Meye* aperis en 1935 la originala strangatmosfera romano *La Longa Vojo*.

Sen ia literatura pretendo estas la aŭtobiografiaj raportoj de la Usonano J. Scherer (1901-1967): *Ĉirkaŭ la Mondon kun la Verda Stelo*, 1933, kaj *Tra Usono kun Ruliĝanta Hejmo*, 1937.

6.7.2.5 *La Socialista kaj Proleta Proza Skolo.* — El ili elstaras la germana aktivulo *Norbert Barthelmess* (1901-), kiu verkis ankaŭ poemojn kaj rakontojn. Li aperigis kelkajn rakontojn kaj romanetojn, kiel *Diablidoj,* 1928, porjunulan verketon pri la tiama socialista „pionira" junularo; *Juneca Ardo,* 1936, priskribantan la revolucian etoson, kiu regis inter la germana proletaro en (probable) la jaro 1923; *Vartejoj,* 1938, kie la revolucia entuziasmo jam perdiĝis: la aŭtoro esploras rakonte edukajn sociajn problemojn, kaj denuncas la burĝajn edukejojn. Lia stilo estas eble iom unutona, kun kelkaj „paroladoj" de la rolantoj, kiuj fakte respegulas la ideojn de la aŭtoro.

Pli interesa estas la romano de la Sovetiano *Vl. Varankin* (1902 – ?), *Metropoliteno,* 1933. La aŭtoro prezentas paralelan rakonton pri la berlinaj laboristaj revoluciaj rondoj kaj pri la moskvaj burokrataj medioj de la tiama kompartio, kiun li plektas kun amrakonto.

De *J. Flamo* aperis la rakonto *La Maja Festo,* 1932. La Aŭstro *H. Weinhengst* en sia romano *Turstrato 4,* 1934, socikritike pritraktas la tiaman mizeran kaj senesperan situacion de la proleta klaso. Li aperigis ankaŭ rakontojn kaj novelojn en SAT-periodaĵoj.

Rakontojn verkis la Belgo *Léon Bergiers* (1904-), kies novelaro, *Ili,* aperis en 1930. Tiu aŭtoro estas ŝajne komplete forgesita, sed li ne meritas tion: li estas unu el la plej sinceraj — kaj samtempe kleraj — voĉoj de nia literaturo. Li eksperimentis en Esperanta prozo, alterne, unue la socirealisman stilon, kaj poste, ebrie ekspresionisman esprimmanieron, kun nervaj frazkonstruoj, hastaj, malegalaj paragrafoj, kiuj sekvas la ritmon de la pensodisvolviĝo. La patoso de Bergiers estas neniam artefarita: ĝi fontas el ribelaj sentoj kontraŭ la situacio, en kiu troviĝas la laborista klaso kaj ĉefe ĝiaj plej malfortaj anoj.

Socirealismajn novelojn kun atentoveka kaj sobra analizkapablo kaj altirforto verkis ankaŭ la Bulgaro *Asen Grigorov* (ps. Marin Ljubin), en *La Himno,* 1931. Ankaŭ alia socirealisma verkisto bulgara, *Ĥ. M. Ĥrima,* aperigis proprajn originalajn novelojn (en *Ĉe Abismo,* 1932).

El la malproksima Oriento venas la rakontoj de la Ĉino *Cicio Mar, Forgesitaj Homoj,* 1937, pri la situacio de la ĉinaj malriĉuloj. La rakontoj de la Ruso *V. Eroŝenko,* kiu longtempe loĝis en Japanio, aperis en *Turo por Fali,* 1923 (reeld. 1956); *Rakontoj de Velkinta Folio* (fabeloj), 1923, dua eld. 1953; kaj en *Rakontoj de Eroŝenko* (kunmetita de Miyamoto masao), 1970. Liaj rakontoj aperis ankaŭ japane, ĉine, ruse kaj ukrajne.

Apartan pozicion havas la sveda proleta ĵurnalisto *Einar Adam-*

son (1894-1953), kiu aperigis stile valorajn artikolarojn pri Sovetunio: *Studvojaĝo en Sovet-Rusujo*, 1926, kaj *Sub Ruĝaj Standardoj*, 1928.

Tute apartan lokon okupas la originalaj verkoj de la Franco *Eugène Adam* (ps. Eŭgeno Lanti, 1870-1947). Ĝis 1914 li estis anarkisto, poste fariĝis revolucia nemarksista komunisto, sed fine ellaboris propran liberecanan doktrinon, kiun li nomis sennaciismo. Li fondis SAT kaj gvidis ĝin dum pluraj jaroj. Li redaktis plurajn periodaĵojn kaj iniciatis multajn prilingvajn laborojn. Liaj libroj estas klasbatalaj verkoj, tamen kun signifo ankaŭ por la neŭtrala Movado. Li proponis kunligi la Esperantan Movadon kun la tiamaj revoluciaj fortoj. Lingve, li estis elstara stilisto: simpla, trafa, eleganta. Lanti aperigis plurajn tradukojn (i.a. de Voltaire). Originale li verkis i.a. *For la Neŭtralismon!*, 1922; *La Laborista Esperantismo*, 1928; *Naciismo*, 1930; *Vortoj de K-do Lanti* (artikolaro), 1931; *Manifesto de Sennaciistoj*, 1931; *Absolutismo*, 1934; *Herezaĵo*, 1934; *Ĉu Socialismo Konstruiĝas en Sovetio?*, 1935; *Leteroj*, 1940.

6.7.2.6 *Satiraj Prozverkistoj.* — Ankaŭ ĉi-kampe majstris la ekzemplo de la Franco *Raymond Schwartz*, kiu aperigis satirajn kaj bonhumorajn prozaĵojn kaj novelojn en *Verdkata Testamento*, 1926; en *Prozo Ridetanta* (fakte: novelaro), 1928; en *La Stranga Butiko*, 1931; kaj en *La Ĝoja Podio*, 1949. Tre ŝatataj estis liaj ĉiujaraj kontribuaĵoj al la jarkajero *Sennacieca Revuo* („Laŭ mia .... Ridpunkto").

De la Polo *Izrael Lejzerowicz* (1901-1942?) aperis amuza, bibliimita pastiĉo, satiranta la tiaman Esperanto-Movadon: *El la Verda Biblio*, 1935, kiu aperis samvolume kun alia satiraĵo, ĉi-foje nepastiĉa: *Babiladoj kun Horaĉo Serĉer*. De alia Polo, *Jakob Szapiro* (1897-1942) aperis en 1921 la satiraj *Babiladoj de Bonhumora Zamenhofano*.

La bulgara sciencisto *Atanas D. Atanasov* (ps. ADA, 1892-) aperigis la satiran verketon *El la Intima Vivo de la Verdurbaj Esperantistoj*, 1927.

La Flandro *F. V. Dorno* eldonis *La Aventuroj de L. R. M. Stultulof la X-a*, 1937, kiu estas satira verketo sen literatura valoro pri la idioteco de multaj regantoj.

6.7.3 Teatro

En ĉi tiu periodo la teatro faris kelkajn progresojn. Aperis verkistoj, kiel Baghy, kiuj sciis doni al ĝi adekvatan lingvon. Tamen plejofte la celo de tiuj teatraĵoj estis sama: amuzi la ĉeestantaron dum grupkunveno. Kompreneble, la amuzo povas esti plurnivela — eĉ atingi kvalitan elstarecon — sed la fakto, ke la ĉefaj aŭtoroj aktivis sur teatra kampo nur sporade kaj per skizoj aŭ unuaktaĵoj

(malofte per verkoj pli konsistaj), malhelpis la atingon de plenvalora teatra nivelo.

La plej interesa teatra verkisto estis la Hungaro *Julio Baghy*, kiu verkis ĉefe unuaktaĵojn. Ili aperis en revuoj, aŭ restis manuskriptaj. Lia ĉefverko estas la verskomedio *Sonĝe sub Pomarbo*, 1956, kie la amo inter du gejunuloj iĝas la rakontframo por lirika, emociveka analizo kaj pritrakto simbola de la neceso je amo en la mondo. La lingvo de ĉi tiu verko estas glate polurita, rime kaj ritme riĉa. Ĝi estas maturaĝa ĉefverko, kiu kronas la verkaron de Baghy. Interesaj estas ankaŭ la dramoj *Samumo* (recitita dum la UK de Budapeŝto, 1929) kaj *La Holanda Pupo*, en la repertuaro de IAT.

Neforgesendaj estas ankaŭ la drametoj de *Raymond Schwartz:* temas ĝenerale pri amuzaj unuaktaĵoj kaj kabaretaĵoj.

Ankaŭ aliaj konataj poetoj kaj prozverkistoj aperigis teatraĵojn. De la Anglo *K. R. C. Sturmer* aperis la drameto *Homarisma Laboro*, 1931; de la Nederlandano *Hindrik J. Bulthuis* la interesaj, realisme sugestiaj *La Onklo el Ameriko*, 1908, kaj ĉefe *Malriĉa en Spirito*, 1923; de la Sovetiano *N. Hohlov* la amuza komedieto *La Morto de ka Delegito de UEA*, 1924; de la Anglo *D. P. Boatman* la unuakta komedio *Jes, Panjo!*, 1932; de la Flandro *Jan van Schoor* la unua versteatraĵo *La Revuo de la 7-a*, 1911; de la Japano *Tabata kisaku* pluraj teatraĵoj.

Ekzistas ankaŭ verkoj, ĝenerale unufojaj, de cetere nekonataj verkistoj. La Anglo *W. G. Adams* aperigis la iom pretendan burleskan tragikomedion en versoj *Piramo kaj Tizbeo*, 1934. De la usona profesoro *Kenngott* venis 6 originalaj amuzaj komedietoj en *Internacia Teatraĵetaro*, 1930. La Ĉeĥo *J. Filip* verkis la religiteman dramon pri la sorto de la homaro *Fino de la Mondo*, 1937. La sama aŭtoro, en la kunlaboro de K. Filip, publikigis en 1964 ankaŭ alian dramon: *La Turo inter Nuboj*. Du komedietojn verkis ankaŭ la Polo *Ludoviko Krysta: La Senvola Svatanto*, kaj *Marionetaj Ludoj*, ambaŭ de 1931. La Flandro *F. V. Dorno* estas la aŭtoro de originala triakta amuza komedio *Levu la Manojn*, 1939. De la Polo *Felix Hiller* venis la unua (kaj sola) esperantlingva opereto: *Ho, Tiuj Fremduloj!*, 1923. Du teatraĵoj de *J. Flamo* aperis en 1932. *D. Thomsen* aŭtoris la komedion *Multe pli da Amo*, 1936. De *Karl Minor* (1891-1946) aperis la farso *Pro Dio, ne Esperantiston!*, 1924.

Interesa estas la verko de la Polo (poste angla ŝtatano) *Jakob D. Applebaum* (1877-1964), kiu aktivis ankaŭ traduke, nome la granda religifona versdramo *Jozefo*, 1957, pri la fama biblia rakonto pri Jozefo kaj la edzino de Potifar.

6.7.4 Kulture Gravaj Verkistoj

Ĉi-kampe, kia ajn elekto estas apriora, kaj, pro la granda nombro, estas neeble citi ĉiujn. Ni limigos nin je kelkaj nomoj, aparte elstaraj kaj ekzemplaj pro ilia laboro, ofte multflanka.

Unu el la plej eminentaj Esperantaj lingvistoj estas la Hungaro *Kolomano Kalocsay*. Li estas granda poeto, rimarkinda tradukisto, kiu fiksis la stilon kaj la poetikon ankaŭ en teoriaj verkoj, kiel ekz. en *Parnasa Gvidlibro*, 1932, verkita kune kun G. Waringhien, kaj reeldonita en 1968 kun kontribuaĵo de R. Bernard. Li malkovris pluajn faktojn pri la Esperanta vortkunmetado, surbaze de la teorioj de De Saussure: en *Lingvo Stilo Formo*, 1931. Li kunlaboris kun G. Waringhien por la pretigo de *Plena Gramatiko*, 1935 (2-a eld. 1938). Pri la ata-ita-demando li kunlaboris en *Simpozio* (redaktita de J. Régulo), 1961, kaj per propra verko, *Vojaĝo tra la Tempoj*, 1966, li klarigis siajn poziciojn. Liaj tradukaĵoj estas jam prezentitaj. Aparte gravaj estas liaj literaturkritikaj kontribuaĵoj en formo de artikoloj kaj de eseoj.

Ekskluzive prilingve verkis la franca licea profesoro *Emile Grosjean-Maupin* (1863-1933). Liaj prilingvaj kontribuaĵoj aperis en *La Revuo, Heroldo de Esperanto, Literatura Mondo*. Lia vivoverko, pretigita en kunlaboro kun aliaj kleruloj, estas la *Plena Vortaro*, 1930, unu el la fundamentoj de la hodiaŭa Esperanta lingva kulturo.

Lia disĉiplo estis la franca agregacia profesoro *Gaston Waringhien* (1901-), originala poeto, valora tradukisto el: La Rochefoucauld, 1935; Omar Kajam, 1953; Baudelaire (kun aliaj), 1957; Heine (kun aliaj), 1969, k.a. Liaj kontribuaĵoj lingvaj, lingvistikaj kaj beletraj aperis en *Literatura Mondo, La Nica Literatura Revuo*, k.a. Libroforme aperis kolekto el liaj beletraj kaj literatursciencaj eseoj: *Eseoj I*, 1956. Alia kolekto, el lingvaj, filologiaj kaj lingvosciencaj eseoj, aperis en 1959: *Lingvo kaj Vivo*. Lia editora ĉefverko estas la duvoluma *Leteroj de Zamenhof*, 1948. Klera leksikologo, li redaktis la gravan *Suplemento al la PV*, 1954, verkis la *Granda Vortaro Esperanto-Franca*, 1957, sed lia leksikologia ĉefverko estas *Plena Ilustrita Vortaro*, 1970.

Unu el la fondintoj de esperantologio estis la Italo *Stefano La Colla* (1889-1966), paleografo, lingvisto, vortaristo, esperantisto ekde 1906. Inter la plej eminentaj esperantologoj kaj interlingvistoj estas sendube la aŭstra inĝeniero kaj specialisto pri terminologiaj problemoj *Eugen Wüster*. Li kompetente tradukis kaj verkis studojn pri pluraj lingvaj specifaĵoj de Esperanto, pri zamenhofa lingvo (*Zamenhof-Radikaro*, 1927). Sur la leksikologia kampo, li aperigis du fundamentajn verkojn: *Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana* (el kiu nur la kvar unuaj partoj aperis, 1923-29) kaj *Maŝinfaka*

Esperanto-Vortaro, 1923. Sennombraj estas liaj prelegoj kaj artikoloj.

Klera zamenhofologo estis ankaŭ *Johannes Dietterle* (1866-1943), kiu aperigis en 1929 la *Originala Verkaro* de Zamenhof.

El la interlingvistika vidpunkto elstaraj estas la meritoj de du bibliografiaj pioniroj: de *Petro E. Stojan,* Ruso (1884-1961), kiu aperigis en 1929 (senŝanĝa represo en 1973) sian monumentan *Bibliografio de Internacia Lingvo;* kaj de *Hugo Steiner,* Aŭstro (1878-1969), fondinto de IEMW kaj verkinto de la trivoluma *IEMW-Katalogo* (1957, 1958, 1969).

Neforgesebla sur interlingvistika kaj esperantologia kampoj estas ankaŭ la aktivado de la Sovetiano *Ernest K. Drezen,* kiu naskiĝis en 1892 kaj estis mortpafita en 1937. Li estis unu el la ĉefaj lingvokleruloj de la tiama soveta skolo, estis sekretario de Kalinin kaj ankaŭ ruslingva specialisto pri terminologiaj problemoj (kaj planlingvistiko).

Estas interese, ke ekzistas aŭtoroj, kiuj influis la stilon de aliaj verkistoj ankaŭ nur pere de siaj tradukoj. Klasika ekzemplo estas la Kroato *Ivo Rotkvić* (1901-), kiu famiĝis per siaj lingvaj artikoloj kaj ĉefe per sia traduko el M. Jelušić (1934).

Aliaj influis tutan skolon, kaj donis apartan brilon al lando: Ekzemplu ĉi fakton la *Moraviaj Esperanto-Pioniroj,* konsistantaj el Jaroslav Mastný (1892-1958), Antonín Kudela (1870-1939) kaj Albín Neužil (1883-1948), kiuj eldonis kaj parte tradukis multnombrajn valorajn verkojn de la ĉeña kaj slovaka literaturoj.

En tiu ĉi kunteksto estas menciinda ankaŭ la agado de la Hungaro *Vilmos Bleier* (1903-1940), kiu kompetente administris la financojn de *Literatura Mondo* ekde 1931, kaj kreis la LM-eldonejon. Lia kreaĵo estas ankaŭ la eldonkooperativo AELA, kiu faciligis kaj sekurigis la aperon de multaj valoraj verkoj originalaj kaj tradukaj.

6.8 ORIGINALA BELETRO 1945 - 1972

6.8.1 Poezio

6.8.1.1 *Enkonduko.* — La hiato inter la unua kaj la dua periodoj de la originala literaturo de Esperanto estas multe pli granda ol tiu inter la dua kaj la tria. Fakte, oni apenaŭ povas paroli pri hiato: iu, kiu atente tralegis la supran ĉapitron, jam konstatis, ke la poetoj, kiuj estis aktivaj dum la dua periodo, tre ofte pluverkis ankaŭ dum la tria; multaj el la budapeŝtskolaj verkistoj aperigis siajn plej maturajn verkojn ĝuste post la Dua Mondmilito. Pro tio la triparta divido de la literaturo estas iom miskompreniga: dum la tria ni ja

rimarkas la pludaŭron de la Budapeŝta Skolo, la naskiĝon de novaj skoloj — kaj bedaŭrinde ankaŭ la malaperon de aliaj. Malaperis i.a. la hispana skolo (ĝiaj ĉefaj reprezentantoj mortis en eksterlanda ekzilo: ĉu en Francio, ĉu en Meksikio), la soveta skolo (perforte silentigita en 1936-1937) kaj la proleta skolo ekstersovetia. Fortikiĝis male la japana kaj la jugoslavia skoloj, plenmaturiĝis la hungara, kaj naskiĝis skota skolo. Antaŭnelonge fortikiĝis ankaŭ itala literaturista grupo.

6.8.1.2 *La Budapeŝta Poezia Skolo dum la Tria Periodo.* — El la ankoraŭ aktivaj poetoj de la Budapeŝta Skolo elstaras kompreneble *Kolomano Kalocsay* kaj *Julio Baghy.* Ambaŭ, unue post 1945; sekve, post 1956, povis ree partopreni la kulturan vivon de la Esperanta Movado. Iliaj originalaĵoj aperis en pluraj literaturaj revuoj, kiel en *Literatura Mondo* (1947-1949), kaj poste en *Norda Prismo, La Nica Literatura Revuo, Monda Kulturo* kaj en *Hungara Vivo.* De Kalocsay aperis ankaŭ multaj elstaraj tradukaĵoj (el Baudelaire, Heine, Shakespeare) kaj kelkaj literaturkritikaj eseoj. De Baghy aperis libroforme la lirika dramo *Sonĝe Sub Pomarbo,* 1956, kaj aliaj verkoj. Rimarkindaj estas la ĉi-periodaj libroformaj kontribuaĵoj de *Lajos Tárkony* (aperis impona elekto el liaj originalaj poemoj en *Soifo,* 1964) kaj de *Imre (Emeriko) Baranyai (Ekzilo kaj Azilo,* 1962).

De la verkistoj, kiuj ĉirkaŭis la Budapeŝtan Skolon, venis pluraj valoraj kompletigaj verkoj. De la Estonino *Hilda Dresen* aperis la poemkolekto *Norda Naturo* en 1967 kaj multaj tradukaj verkoj en pluraj kulturaj revuoj. La Svedino *Magda Carlsson* eldonigis kelkon da siaj ĉefaj kontribuaĵoj al la poezia tradukliteraturo. Ankaŭ de la Anglo *L. N. M. Newell* aperis la tradukaĵo de *Hamleto,* 1964, kiu revolucie efikis ĉe publiko, kutimiĝinta al la klasika Zamenhofa traduko. Reaperis ankaŭ verkoj de la „Panamano" (verŝajne: Franco) *Georgo E. Maura,* kies dua eldono de *Duonvoĉe,* kun pluraj aldonoj, eldoniĝis en 1963 kaj kronis lin unu el la plej atentindaj talentoj de la originala Esperanta poezio.

Ankaŭ en Ĉeĥoslovakio la du verkistoj *M. Lukáš* kaj *T. Pumpr* daŭrigas la laboron. Al ili aliĝis tuta grupo, kiu aktivas plurkampe. Kvankam iom sporade, tamen ankoraŭ nun aperas verkoj de la Franco *Henri Vatré* kaj de la Hispanino *A. Núñez-Dubús,* kaj eĉ de la pola proleta poeto *E. Matkowski.*

6.8.1.3 *La Skota Skolo.* — La granda novaĵo de la tria periodo de la Esperanta literaturo estas la estiĝo de grupo, nomata „Skota Skolo", konsistanta el valoraj literaturistoj, ĉefe poetoj. Ĝia naskiĝo ne estis rapida, kiel oni povus imagi. Ja multaj el la pli postaj skotaj poetoj fakte verkis dum la lasta periodo de *Literatura Mondo* (1947-1949), el kiu ili sucis sian unuan literaturan lakton. Sed grava ren-

kontiĝo-punkto estis ankaŭ la regula apero (ekde 1947) de la modesta, sed enhave kaj historie signifa periodaĵo *Esperanto en Skotlando,* kiu estis palestro kaj diskutejo por la tiamaj junaj verkistoj. Ekz. W. Auld redaktis ĝin inter 1949 kaj 1955.

Sed la momento de la publika elpaŝo estis la volumo *Kvaropo,* 1952. Ĝi samtempe signis la elpaŝon de nova, gravega eldonejo, tiu de Prof. J. Régulo-Pérez en La Laguna, kiu ŝtopis breĉon kaŭzitan de la malapero de la eldonejo de Literatura Mondo.

Kvaropo prezentis la verkojn de kvar librodebutaj poetoj: W. Auld, J. S. Dinwoodie, J. I. Francis kaj R. M. Rossetti.

William Auld (1924-), skota instruisto, ellerninta la lingvon en 1937, sed aktiviĝinta nur en 1947, kunlaboris en pluraj revuoj, kaj estis redaktoro de *Monda Kulturo* (1962-1963). Lia kontribuaĵo al *Kvaropo,* 1952, nomiĝas *Spiro de l'Pasio.* En 1956 li aperigis la grandan poemon *La Infana Raso* (1968: 2-a eld. kun notoj). Li redaktis la poezian parton de *Angla Antologio,* 1957, redaktis la *Esperanta Antologio 1887-1957,* 1958, kaj pretigis ties kritikan enkondukon. Liaj originalaj poemoj troviĝas ankaŭ en *Unufingraj Melodioj,* 1960. Lia lasta originala poemaro estas *Humoroj,* 1969. Auld estas poeto profunde mem-analiza, kiu scias rekrei poezie, tra la propra mio, sian subkonscian mondon, kiu elimpetas por aserti sian vivorajton. Sed li neniel estas intimisto: kontraŭe, lia inspiro, kvankam esence personforma, fontas el la tuta mondo kaj el la ĉefaj homaraj problemoj. Tio vidiĝas ĉefe en la poemo *La Infana Raso,* kiu estas lia ĉefverko. Tie, li pritraktas la historion de la universo kaj la homkondiĉon en eposaj versoj, kiuj forme varias laŭ la neceso esprimiĝi — kaj laŭ la atingita profundnivelo. W. Auld estas socia progresista ateisto: pasie li kondamnas la militon, la maljustecon, kaj iliajn sekvojn, kaj li bone komprenas la problemojn de la libero (ankaŭ intelekta). Sed en liaj poemoj ĉio ĉi restas ofte nur en akuza formo, sen prezento de pozitiva, ankaŭ nur idealisma solvo. Tiu konstato neniel malgrandigas lian kritikan forton, kiu, kontraŭe, kvazaŭ kun la forto de la malespero impetas kontraŭ la baroj, kiuj malhelpas la homaran progreson al vera, nova humanismo.


De la skota pastro *John Sharp Dinwoodie* (1904-), kiu kunlaboris en *Literatura Mondo* kaj multe tradukis, aperis en *Kvaropo,* 1952, poemkolekto *Kastelo el Revoj.* Poste, tamen, liaj verkoj aperis nur sporade. Lia poezio respegulas delikatan spiritan lirikecon. Al li ne estas fremdaj la spiritaj turmentoj de nia epoko, kies solvon li trovas en Dio, kaj en la religia kredo. En tiu Di-konfido, Dinwoodie vivas sian poetan vivon: liaj temoj pritraktas amon al la edzino, la kompaton por la pekintoj, kies pekoriginon li vidas tamen ĉefe en la sociaj vivkondiĉoj.



William Auld: Aŭtentika poezia mondo.



Marjorie Boulton per metaforoj defendas sian humanismon.



Kvaropo, la mejloštona verko de la Tria Periodo.

La skota instruisto *John Islay Francis* (1924-), esperantisto ekde 1942 (aktiva tamen nur ekde poste), kunlaboris en *Malgranda Revuo, La Nica Literatura Revuo, Esperanto en Skotlando.* En *Kvaropo,* 1952, aperis lia poemo *La Kosmo.* Ĝi dividiĝas en 5 kantojn kaj pritraktas la estiĝon de la mondo, ĝian vivon kaj ĝian malaperon, ĝis restariĝos la kaoso. Francis estas pli konata kiel novelisto.

Francis similas iomete al Auld en siaj kritikaj intencoj, sed li estas malpli impulsa. Li anstataŭigas la impeton de la poezio per elegantaj, ironiaj versoj; lia ironio distancigas lin iom de la homo, al kiu li tamen sin sentas ligita.

De la Svis-Anglo *Reto Mario Rossetti* (1909-) aperis en *Kvaropo,* 1952, la poemkolekto *Oazo.* Li ankaŭ tradukis multe (i.a. *Otelo,* 1960). Li estis redaktoro por la proza parto de *Angla Antologio,* 1957, kaj, kun Szilágyi, li redaktis *La Esperanta Novelarto,* 1964. Li aperigis ankaŭ novelojn. Lia poemaro, krom en *Kvaropo,* aperis ankaŭ en *Literatura Mondo,* en pluraj postmilitaj gazetoj, kaj en la libro *Pinta Krajono,* 1959. La poezion de Rossetti karakterizas altnivela elegantec-ekvilibro: tiu ekvilibro, kiu strikte kongruas kun la tipa stilstrukturo senpompa kaj esenca de la aliaj verkistoj, estas fundamenta elemento de lia verkado. Memanalizaj profundoj, kiel ĉe Auld, ne estas troveblaj ĉe Rossetti. Li estas iom ironia, aŭ eventuale nur konstata, sed neniam cinika aŭ morda. Oni havas la impreson, ke lin ne tuŝas esence la senespera serĉo de ekzistokialo: tiu ekzisteca problemo ne tiom koncernas lin kiel poeton; li preferas observeme analizi la momentan homkondiĉon, pri kies stabileco, kompreneble, li ne povas kredi.

6.8.1.4 *Ĉirkaŭ la Skota Skolo.* —

(a) *Anglaj Verkistoj:* La angla verkistino kaj instruistino *Marjorie Boulton* (1924-), kiu lernis Esperanton en 1949, kaj verkis plurajn librojn, ankaŭ angle, aperigis sian unuan originalan poemkolekton en 1955: *Kontralte.* Baldaŭ sekvis *Cent Ĝojkantoj,* 1957, kaj *Eroj,* 1959. Ŝi verkis ankaŭ teatraĵojn kaj novelojn. Ŝi estas varmtona poetino, kun impulsa formtrova kapablo kaj profunda sincero. El la propra intimo ŝi lasas aperi siajn pasiojn kaj turmentojn, tiel nudigante antaŭ la leganto sian animon. Aliflanke, ŝi estas ankaŭ socie konscia poetino, kiu, per siaj verkoj emoci-lirikaj, prezentas kaj defendas sian idealisman humanismon.

En 1957 aperis la verko *Kien la Poezio?* de la novzelanda instruisto kaj anglalingva poeto *Brendon Clark* (1904-1956), kiu tie prezentas propran metrikan teorion, kun multaj ekzemploj el poemoj tradukitaj kaj originalaj, i.a. kun la hero-poemo heksametra *La Vojaĝo de la Maorioj al Novzelando.* Li estas poeto, kiu ankoraŭ forte resentas la influon de la dua periodo, aparte de la Budapeŝta

Skolo: liaj versoj estas glate poluritaj, liaj temopritraktoj ankoraŭ rimarkinde romantikaj.

En 1967 aperis la verketo *Memkritiko* de *Victor Sadler* (1937-), kiu lernis Esperanton en 1951, kunlaboris en *Esperanto* kaj *The British Esperantist.*

Sadler provis enkonduki eksperimentan poezion, kies poemoj kunplektiĝas kun la suba komento, tiel, ke unu sen la alia estas sensenca. Li ekzemplas la valoron, kiun por nia literaturo havas la pozitiva influo de la nacilingvaj literaturoj en la renovigo de la formoj kaj de la temoj.

Aperis, krome, ĉefe en *Esperanto en Skotlando*, poemoj de la Anglo *Arthur Dawson Foote* (1931-), kiu lernis Esperanton en 1943, kaj verkis ankaŭ angle. Malfeliĉe jam de kelkaj jaroj li silentas. Li estas eleganta naturinspirita poeto, kiu regas la stilon de la japaneska miniaturo same bone kiel tiun de la polurita, belmuzika soneto.

(b) *Ĝermanaj Poetoj:* Unu el la plej rimarkindaj neanglaj poetoj influitaj de la Skota Skolo estas sendube la islanda magistro pri angla lingvo *Baldur Ragnarsson* (1930-), kiu lernis Esperanton en 1949. Li verkis originale kaj traduke (el la antikva islanda, 1964, kaj el Thorsteinn frá Hamri, 1963). Li aperigis siajn verkojn en *Voĉo de Islando, Norda Prismo, Esperanto,* kaj en 1959 aperis lia poemaro *Ŝtupoj sen Nomo.*

Ragnarsson estas instinkta, multimaga, malfacila poeto. Liaj versoj, muzike imponaj, estas metafore, simbole verkitaj, buntaj, kaj nekutimaj. Lia inspiro ŝajnas fonti el tiu plej profunda parto de la psiko, kie kuniĝas la individua kaj la kolektiva, tuthomara subkonscioj.

Alia granda verkisto estas la sudafrika instruisto *Edwin de Kock* (1930-), kiu lernis Esperanton en 1955 kaj verkis ankaŭ angle kaj afrikanse. Liaj poemoj aperis en preskaŭ ĉiuj postmilitaj kulturaj revuoj, sed precipe en *Norda Prismo.* Li ellaboris ankaŭ neklasikan poetikon, kiun li eksplikis en apendico al du siaj verkoj (1961, 1967). Liaj poemoj aperis en *Ombroj de la Kvara Dimensio,* 1961; *Fajro sur Mia Lango,* 1967; *Poemoj kaj Prozeroj,* 1970; *Kvin Elementoj,* 1970. La versoj de De Kock estas konstruitaj en densa vortsinsekvo, kie la formo aliancigas kun la enhavo por efiki en malvolviĝo signifodona per la amasiĝo de la konceptoj kaj de la simboloj. La angoro de la homo antaŭ la universo solviĝas, ĉefe en lia unua poemaro, en malgaja historikompreno, kiun regas la imago de severa dio. Lia esence intelekta poetiko kondukis lin al kritika sinteno kontraŭ homsubpremo. Iom post iom li atingis versmuzikon; liaj versoj nun fluas pli glate ol antaŭe. Lia *Kvin Elementoj* estas ampleksa plurparta poemo pri la homa naturmondo: verko ambicia kaj mirinda.

De la dana instruisto *Poul Thorsen* (1915-), kiu multe tradukis el la dana, aperis originalaj poemoj en *Rozoj kaj Urtikoj,* 1954; *Pluk,* 1960 kaj *Sen Paraŝuto,* 1963. Thorsen preferas la satiran poezion, kie li ĉizelis multajn valorajn juvelojn. Ne mankas ĉe li tamen ankaŭ momentoj de delikatsenta lirika inspiro.

Lastatempe aperis kelkaj interesaj originalaĵoj de la Nederlandano *Wouter Pilger,* kies tradukaĵoj estas tamen pli konataj.

(c) *Brazilaj Verkistoj:* En Brazilo, la ekzempla kultura vivo enlanda montriĝis pozitiva por la elkresko de originalaj poetoj. La unua periodo de la brazila skolo estis profunde influita de la Budapeŝta Skolo, kaj konsistis ĉefe el tradukantoj. Inter tiuj elstaras la pioniro *Francisco Valdomiro Lorenz.* Nuntempe ankoraŭ tre influita de la Budapeŝta Skolo estas sendube la elstara tradukanto *L. H. Knoedt* (li tradukis el Castro Alves, 1959), dum ĉe la aliaj la skota influo estas pli sentebla, eble tamen tra Baldur Ragnarsson, kiu, se li ne havas ilian sangbolan temperamenton, tamen havas analoge imagriĉan lingvon.

De la brazila advokato *Sylla Chaves* (1929-) aperis en 1959 la poemlibro *Animo Prisma.* Per elektitaj stilrimedoj, li kreas aktualan poezian mondon, kiu ne estas senkarna kaj minimuma, kiel ĉe la eŭropaj verkistoj, ĉefe skotaj, sed male riĉa je sango, kun forta tendenco al barokeco, ne manierisma, sed karaktera kaj instinkta. En 1970 aperis lia *Por pli Bona Mondo,* kun valoraj eseoj, tradukaĵoj, originalaĵoj (i.a. la unuaj du kantoj de la ampleksa poemo *Homara Epopeo).*

Geraldo Mattos (1931-), esperantisto ekde 1949, ekverkis en 1951. En 1953 aperis lia ankoraŭ nematura originala poemo *La Tento de Junulo,* en 1959 poemetaro *Miniaturoj,* kaj en 1967 lia impona *Arĉoj,* sekvata de *Ritmoj de Vivo,* 1968. Li verkis ankaŭ teatraĵon kaj novelon. Mattos estas pasia poeto: lia animbrulo impetas el ĉiu verko el sub la teknike elstara forma vestaĵo. Kiel bone li sciis pritrakti la juvelojn de momenta impreso en *Miniaturoj,* same bone li aliris pli kompleksajn temojn, kiujn li analize malvolvas per impulsema simpatio kaj rimarkinda tekniko, kiu neniam kovras mankon de inspiro. Liaj lastaj verkoj malkovras plene maturan poeton, kies signifo por la Esperanta kulturo estas ankoraŭ ne taksebla.

Aperis ankaŭ verketo el 14-silabaj sonetoj, *Monosilaboj,* 1967, de *Diderto Freto.* Temas pri brila sed evidente senfutura ekzemplo de teknika virtuozo.

6.8.1.5 *Postefikoj de la Budapeŝta Skolo.* —

(a) *La Situacio en Hungario:* Pri la situacio de la Esperanta literaturo en Hungario ni jam aludis. La majstroj ankoraŭ laboris, sed dum longa tempo devis silenti. Krome, malaperis *Literatura Mondo*

kaj ĝia eldonejo, kiuj estis la spirita kaj materia centroj de la Skolo. Feliĉe, ekde 1961 aperas valora kultura revuo, *Hungara Vivo*, kiu sukcesis arigi ĉirkaŭ si ne nur la malnovajn majstrojn, sed ankaŭ novajn fortojn. El tiuj novaj fortoj elstaras la juna poeto Vilmos Benczik.

(b) *La Situacio en la Slavaj Landoj:* En 1962 aperis la verkoj de la Bulgaro *Ivan St. Georgiev*, en *Provo Alfronti la Vivon*, kiu fakte frontas temojn iom leĝerajn, sed kun verve interesa stilo, kiun W. Auld nomas „gaja kapriolemo".

Ankaŭ de Sovetunio venis voĉo: temas pri la kolekto el poemoj de *Aleksandro Logvin* (ps. Liljer), en *Sur la Vivovojo*, 1964. Logvin, kies verkoj jam aperis antaŭ la Dua Mondmilito, estis, unue, poeto ligita al la tiamaj skoloj. Li evoluis stile kaj enhave, tiel ke nun la stilo de liaj verkoj elstaras per la atingita formala fajneco dank' al pacienca laboro de fajlado kaj daŭra versopolurado. Liaj temoj estas faktoj de la propra vivo (kiu estis plenplena de malĝojigaj kaj penigaj eventoj), la amo por la propra patrio (Ukrajno), kaj malamo por la invadintaj nazioj. Tre oftaj estas liaj verkoj inspiritaj el la plej pura lirikeco, kie la aŭtoro uzas neklasikan metrikon.

La pola ĵurnalisto *Walerian Włodarczyk* aperigis en 1965 sian poemvolumon *Mia Mio*. Temas pri debuta verko, kie la aŭtoro abunde elversas apenaŭ prilaboritajn sentojn kaj emociojn, el propra intimo. Poezia (enhava kaj teknika) maturiĝo estas probablaj, ĉar la aŭtoro ne malhavas talenton. Li kunlaboris regule el la polaj Esperantaj revuoj.

(c) *La Ĉeĥoslovaka Skolo:* La dummilitaj kaj postmilitaj tempoj en Ĉeĥoslovakio ne estis favoraj al Esperanto. Nur de antaŭ relative malmulte da tempo reaperas verkoj kaj revuoj. Krom, komprenеble, *Miloš Lukáš* kaj *Tomáš Pumpr*, el kiuj la unua ankoraŭ aktivas traduke kaj originale, la ĉeĥoslovaka skolo montriĝis ankoraŭ vivanta, kvankam ĝi povis ĝis antaŭnelonge nur tre malmulton eldoni enlande. Libroforme aperis la originalaj poemoj de la ĉeĥa instruistino *Eli Urbanová* (1922-): *Nur tri Kolorojn*, 1960. Ŝi estas sincera, intimmalkovra poetino, kun varma erotika sento, kiu bolas sub elegantaj, formperfektaj poemoj, kun lirikeca percepto, per kiu ŝi malvolvas siajn temojn.

Libroforme aperis ankaŭ la poeziaj verkoj de la edzo de Eli Urbanová, *Ŝtefo Urban*, muzikprofesoro kaj komponisto (1913-), kiu muzikigis multajn poemojn de la budapeŝtaj kaj skotaj poetoj. Li kunlaboris en *Esperanto en Skotlando*, *Norda Prismo* kaj *Heroldo*. Liaj poemoj aperis en *Nova Ezopo*, 1961. Temas pri satira kaj sagĝinstrua poemetaro pri homaj malfortoj kaj malvirtoj, kiujn la aŭtoro pikas metafore per modernproblemaj bestoj kaj per la vivigo eĉ de ĉiutagaj objektoj. Li verkis ankaŭ novelojn.

Al ili kuniĝas multaj aliaj aŭtoroj, kies verkoj aperis en la ĉefaj postmilitaj Esperantaj periodaĵoj, kaj parte, ankaŭ en *Esperanta Antologio,* 1958. Elstaras *Karolo Píč* (1920-), ĉeña librotenisto, kiu abunde verkis originale. Rimarkinda estas ankaŭ *Jiří Kořínek* (1906-). Li verkis originale kaj traduke, kaj ĉe li kuŝas multaj neeldonitaj manuskriptoj. Ekde 1950 li kunlaboris en pluraj periodaĵoj. Atentindaj estas ankaŭ la verkoj de la ĉeña aktorino *Eva Seemannová-Suchardová* (1920-), kiu verkis plurajn poemojn kaj aktoris en „La Verda Ĉaro de Julio Baghy". Poemojn originalajn kaj tradukitajn prozaĵojn verkis *Jana Cíchová* (1923-). *Jožko Staněk* estas citinda, ĉar li estis premiita dum Belartaj Konkursoj.

(ĉ) *Latinidaj Poetoj:* De la franca komercisto *Lucien Jacques Thèvenin* (1891-1962), esperantisto ekde 1907, aperis la poemkolekto *La Vana Kanto,* 1947. Liaj lirikaĵoj estas simplaj, naturinspiritaj, ofte kun belaj metaforoj, kaj, kelkfoje, kun taŭge simpla, sed impresa lingvo. Li neniam falas en manierismon aŭ sentimentalecon, ĉar li scias ellabori siajn temojn. Li esprimas la intimon de la naturo, kiun li rigardas kun ankoraŭ idiliaj okuloj.

Ankoraŭ tre ligita al la temoj kaj al la formoj de la Dua Periodo estas la belga tradukisto, nun loĝanta en Svislando, *Claude Piron* (1931-), kiu lernis Esperanton en 1945. Li estis premiita en la Belartaj Konkursoj. Liaj poemoj aperis grandparte unue en *Belga Esperantisto,* poste ankaŭ en aliaj periodaĵoj.

En la lastaj tempoj aperis ankaŭ du francaj poetoj kaj eseistoj, *Michel Duc-Goninaz* kaj *Paul Lobut,* kies verkoj aperis ĉefe en periodaĵoj. Unu el la plej gravaj perdoj estis la malapero de la *hispana-kataluna poezia skolo* pro la sekvoj de la hispana civila milito. Pluraj poetoj elmigris, sed, maljuniĝintaj, ne plu verkis (ekz. J. Mangada-Rosenörn, J. Grau-Casas). Aliaj ekaktivis ĝuste eksterlande, kiel la hispana, nun meksikia, profesoro pri atomfiziko kaj moderna fiziko *Juan de Oyarzábal-Orueta* (1913-), kiu lernis Esperanton en 1954 kaj verkis originalajn poemojn. Lastatempe tamen ekaperis la unuaj postmilitaj tradukaj eminentuloj kaj poetaj voĉoj ankaŭ en Hispanio. Inter la ĉi-lastaj, estas menciindaj *Salvador Gumá* kaj *Gabriel Mora-i-Arana,* kies verkoj aperis en pluraj nuntempaj revuoj.

En Argentino nun aktivas originala poeto, eble pli fama pro siaj tradukaĵoj: *Diego Selso* (ps. de Adán Hrynkiewicz), kies *Kelkaj Strofoj* aperis en 1963. En 1966 aperis kroma originalaĵo: *En la Flamoj Voluptaj de l'Amo.*

(d) *Aliaj:* Poeto, kiu trovas sian inspiron en la naturo, estas la Nederlandano *Anton H. Leenhard,* kies malgranda sonetaro *Somera Simfonio* aperis en 1970. Li estas poeto senpere lirika, kun tre fra-

gilaj temoj. Estas atentinde, ke lia libroforma poemaro ne estas reprezenta: li verkis multe pli valorajn poemojn, kiuj aperis dise en la Esperantlingva gazetaro. Lastatempe aŭdiĝis nova voĉo: *Miozoto*, de *Benita Kärt, 1970.*

6.8.1.6 *Proleta Skolo.* — Unu el la plej gravaj perdoj de la Esperanta literaturo estas la malapero de la iama proleta skolo. Parto malaperis sub la stalinisma reĝimo (ne nur en Sovetunio), parto malaktiviĝis en Okcidento sekve de la politikaj kaj sociaj kondiĉoj, kiuj kondukis la iamajn revoluciajn fortojn al ĉiam pli grandiĝanta integriĝo en la burĝan socion.

Ne tute malaperis, tamen, proletaj poetoj. Tiamaniere, en Sovetunio elstaras la poeto *K. Gusev*, kiu multe tradukis kaj verkis originale. Rimarkinde kontribuis al la Esperanta literaturo, tamen ĉefe per tradukoj kaj eseoj, la Uzbeko *Petro Polišĉuk.* Oni ne rajtas forgesi la bulgaran poeton *Canko Murgin*, kies *Kantoj por la Paco* aperis en 1955. Ankaŭ de la Ĉino *Armand Su* aperis multaj elĉinaj tradukaĵoj, kaj pluraj originalaj poemoj, kiuj ofte pritemas reeĥe la tutmondajn batalojn de la laborista klaso kaj de la koloniaj popoloj.

6.8.1.7 *Itala Skolo.* — En Italio aperis pluraj verkistoj, aktivaj sur poezia kaj proza kampoj, kiuj, almenaŭ parte, unuiĝis en la literatura grupo „La Patrolo", kun propra, modesta sed ambicia organo *Literatura Foiro.* La fondintoj de „La Patrolo" estas la poeto *Nicolino Rossi*, la prozverkisto kaj poeto *Giorgio Silfer* kaj la poeto *Gaudenzio Pisoni.* Aliaj membroj aliĝis poste. El la hodiaŭaj poetoj elstaras sendube *Nicolino Rossi*, kiu verkis sufiĉe abunde, kaj en la lastaj jaroj maturigis sian stilon kaj sukcesis verki modele elegantajn poemojn. En Italio, ĉi-periode, aktivas poezie ankaŭ *Mario Sola, L. L. Tadolini, Vincenzo Musella*, k.a.: iliaj verkoj, el kiuj pluraj estas tradukaj, aperis en kelkaj revuoj, i.a. en *Esperanto* kaj *L'Esperanto.* Valora poetino montriĝis la eseistino kaj novelistino *Clelia Conterno-Guglielminetti*, kies originalaj poemoj aperis en *Eta Vivo*, 1970.

6.8.1.8 *Japana Skolo* (dua generacio). — Inter la unuageneracia kaj la duageneracia Japanaj Skoloj ekzistas neniu hiato: temas vere nur pri kronologia divido. Fakte, ankaŭ dum ĉi tiu periodo aperis verkoj de la nun plenmaturaj majstroj *Ossaka kenĵi* (1888-1969) kaj *Ito saburo* (1902-69), ambaŭ antaŭnelonge mortintaj. La aliaj poetoj cititaj supre ankoraŭ aperigas verkojn. Sed kelkaj novaj voĉoj aŭdigas sin sur la japana scenejo, tre personaj, unuflanke, sed tre

komunkarakterizaj, aliflanke, tiel, ke nun vere montriĝas, ke temas ja pri aparta skolo.

Unu el la plej rimarkindaj modernaj poetoj kaj verkistoj estas *Miyamoto masao* (1913-), kiu multe kaj kompetente tradukis, aperigis ankaŭ prozajn kaj poeziajn originalaĵojn, kaj laboris sur lingva kampo. Liaj originalaj poemoj aperis dise en japanaj kulturaj revuoj kaj en *Invit' al Japanesko*, 1971.

Originalajn poemojn en ĉi-periodo aperigis ankaŭ *Nakamura tazuo* (ps. *Teruo Mikami:* 1911-), esperantisto ekde 1929, redaktoro de *Oomoto* ekde 1952, pli konata kiel esperantologo kaj sciencverkisto. Plej lasta aperis sur la belartkonkursa kampo la talenta kaj promesplena *Kuroda masayuki* kaj la tre aktiva kaj plurfaceta verkisto *Ueyama masao*.

Nova poeto elpaŝis kun propra verkaro (originala kaj tradukita) en 1971: *Landlimo jam Pasis*..., hajkaro de Yamada tempu.

Citinda estas la atenta flego, kiun ricevas la tradicia japana literatursento. Tiurilate elstaraj estas la anoj de la „Hajkista Klubo", kiu ĉiujare aperigas libreton, kun valoraj verkoj. En 1967 aperis *Suito '67*, kun originalaj hajkoj de *Tanaka sadami, Yamada tempu, Murata keinosuke, Tomita tomu, Ueyama masao* kaj *Miyamoto masao*. En 1968 aperis tradukverko el modernaj japanaj hajkistaj poetoj. Sekvis *Kvinteto '69*, kun originalaj hajkoj de la supre menciitaj poetoj (escepte de Yamada tempu). Similaj verketoj aperas daŭre: *Kapriĉo '70* (1970), kaj *Nokturno '71* (1971). En 1965, sub la redakto de Nakamura tazuo kaj Miyamoto masao, aperis la antologia verko *Japana Kvodlibeto*, kun poeziaj, prozaj, teatraj kaj eseaj originalaĵoj de la japanaj verkistoj de la unua kaj la dua generacioj. Estis preterlasitaj kelkaj el la pioniroj (i.a. Ĉif tošio, Fukuta kunitaro, Aguro saiiĉiro (ps. S. Aglo)), kaj granda parto de la socikritikaj kaj revoluciaj verkistoj, kiel Oka kazuta (Tagi-Ĝo), Košinaka hirošI, k.a.

Tiaj antologiaj verkoj, kun historia enkonduko, estas tre valoraj helpiloj por la kono de la kultura vivo de skolo: kvankam komprenebIe oni povus diskuti pri kelkaj enmetoj — kaj, ĉefe, pri pluraj ellasoj.

6.8.1.9 *La Jugoslavia Skolo.* — Ankaŭ inter la unua kaj la dua generacioj de jugoslaviaj verkistoj ne ekzistas hiato: tiu skolo plifortiĝis ĉirkaŭ *La Suda Stelo*, kaj en la sino de la forta landa jugoslavia Movado.

Rimarkinda poeto estas la kroata profesoro *Josip Velebit* (1911-), kiu kunlaboris en *La Suda Stelo*, kaj verkis poemojn ankaŭ kroate.

Atentinda estas la kultura agado de la kroata juristo *Božidar Vančik* (1909-1970), kiu lernis Esperanton en 1928, sed aktiviĝis nur en 1931. Li multe tradukis, ĉefe poezion, kaj kunlaboris en *Literatura Mondo* (post la Dua Mondmilito) kaj en *La Nica Literatura Revuo*. Krome, li kunredaktis la revuojn *Internacia Kulturo* kaj *La Suda Stelo*. Grava estas lia traduko de *La Kavo*, de J. G. Kovačić (1960).

De la kroata instruistino *Antonija Albert* (1901-), kiu lernis Esperanton en 1956, aperis pluraj poemoj kaj prozaĵoj, ankaŭ kelkaj en *La Nica Literatura Revuo, Oomoto, Monda Kulturo;* ŝi partoprenis en Belartaj Konkursoj. Ŝi estas interesa eksperimenta poetino: la poemoj havas matematikan strukturon, kiu geometrie povas kunligi la okulojn (do la formsenton) kun la sento poezia.

En 1969 aperis la poemkolekto *Maristo Surmaste* de la jugoslavia poetino *Vesna Skaljer-Race* (1911-), kiu lernis Esperanton en 1955. Ŝiaj verkoj aperis ankaŭ en *La Progreso, La Suda Stelo*, k.a. Ŝi estas poetino relative lingvosimpla, kun tamen tipe virina kun-sentemo, kaj ia gracio, ĉefe en poemoj rilatantaj al naturo kaj emocio. Ŝi publikigis kelkajn poemarojn ankaŭ en la serbokroata lingvo.

Ankaŭ multaj aliaj verkistoj aktivas, pli malpli sporade kaj malabunde, tamen konstante: de la slovaka poeto *Ján Labáth* (1926-) aperis originalaj versaĵoj en *La Suda Stelo;* de *Tibor Sekelj* (1912-), verkisto, vojaĝanto, prelegisto, kelkaj originalaj poemoj; de *Tone Rogelj* (1940-), Sloveno, originalaj poemoj en *La Progreso*. La svisdevena dramaktorino *Margarethe (Greta) Stoll* (1912-), kiu verkis ankaŭ en la serba, publikigis originalajn esperantlingvajn poemojn kaj novelojn. La serba ekonomikisto *Gvozden Srediċ* (1935-), ellerninta Esperanton en 1953, aperigis originalajn poemojn en naciaj kaj internaciaj Esperantaj gazetoj. De la serba poetino *Nedeljka Subotić* (1934-) aperis originalaj versaĵoj en *La Progreso, La Suda Stelo*, k.a. La kroata universitata docento *Dalibor Brozović* (ps. Bo Zorović, 1927-) verkis plurajn originalajn poemojn, sed li estas pli konata pro siaj tradukoj el la kroata, serba, makedona kaj pro siaj prilingvaj artikoloj, kritikoj kaj recenzoj en *La Suda Stelo*.

Tre interesa verko estas *Reeĥoj — Jugoslavia Poemaro*, aperinta en 1961, kun la antaŭparolo kaj sub la redakto de *Marinko Gjivoje*. Tiu verko prezentas poemojn de 19 poetoj jugoslaviaj de la unua kaj de la dua generacioj.

6.8.2 Prozo

6.8.2.1 *Ĉefaj ankoraŭ Aktivaj Verkistoj de la Dua Periodo.* — Aperigis siajn plej maturajn prozverkojn post la Dua Mondmilito la Hungaro-Svedo *Ferenc Szilágyi,* pri kies novelaroj kaj romaneto ni jam parolis. Ankaŭ la Franco *Raymond Schwartz* pluverkis, kaj kronis sian karieron de prozverkisto per la majstra romano *Kiel Akvo de l'Rivero,* 1963. De *Stellan Engholm* aperis postmilite romano *(Vivo Vokas,* 1946). Lia graveco estas rimarkinda, ĉar dummilite li aperigis en la neŭtrala Svedio literaturan revuon, *Mal'granda Revuo* (1943-1952), kiu longe estis la sola kunligorgano de la tiutempaj Esperantaj verkistoj. Aperis krome aŭtobiografia romano de la hungara Judo *T. Ŝvarc,* 1965, noveloj de la Polo *Jean Forge* (Fethke), 1961, kaj aŭtobiografio de la Bengalo *Lakshmiswar Sinha,* 1966.

El la proletaj prozverkistoj aktivas ankoraŭ la Bulgaro *Asen Grigorov* (ps. Marin Ljubin).

6.8.2.2 *La Angla Prozverkista Skolo.* — Ekster la fluo de la Hungara kaj de la komenciĝanta Skota Skoloj aperis du romanoj. La unua, publikigita en 1946, estas romaneto de angla junulo, *Donald Muns,* kiu verŝajne verkiŝ por samaĝuloj: *Londonanidoj.* La dua, de la Usonano *James Denton Sayers* (1888-1957), estas *Invito al Ĉielo,* 1949. Ĝi estas fikcia rakonto pri flugo al Marso, kun kiu plektiĝas krudaj filozofiaj temoj, kiuj ne tre kongruas kun la fikcia parto. En 1949 aperis la verko de la Svis-Anglo *Cesare Rossetti* (1902-1950), *Kredu min, Sinjorino!,* aŭtobiografia romano pri lerta vaganta potvendisto, skribita en tre vigla kaj vivanta lingvo.

En 1946 venis faciltona, sed interesa novelkolekto de *Mason Stuttard, La Virineto en Bluo,* en simpla sed ĉarma lingvo.

John Islay Francis, unu el la Kvaropanoj, aperigis en 1960 la novelaron *Vitralo.* Francis havas talentan rakontkapablon. Lia ĉeftrajto estas ironio, per kiu li objektive analizas ekstremajn ekzemplojn de homaj kutimoj kaj sintenoj. En la noveloj, kie ironio ne estas la ĉeftrajto, li verkas realisme, kun forta, kvankam ne ĉiam bone perceptebla sento de kompato.

Reto Mario Rossetti aperigis novelkolekton: *El la Manikoo,* 1955, kie li prezentas skizojn en vigla kaj riĉe esprimpova familiara stilo, ŝuldata al lia speciala lingvotalento. Liaj noveloj estas plejofte skizoj, momentaj okulkaptoj de okazaĵoj, sen granda malvolviĝo de la temo: la tuta surpriza faktoro en ili estas la lingvo.

La poetino *Marjorie Boulton* aktivas ankaŭ sur proza kampo. Ŝiaj prozaĵoj aperis en *Dekdu Piedetoj,* 1964, kaj en la novelkolekto

Okuloj, 1967. Ŝi estas plenmatura verkistino, kun akra analiztalento, kiun mildigas la kompata sento kaj ia simpatiplena — aŭ humura — aŭtorpartopreno.

Premiita por noveloj estis la angla ŝtatoficisto *Richard John French* (1883-1959), kiu lernis Esperanton en 1939. Liaj noveloj estas mildaj rakontoj, kiuj analizas la homan kondiĉon amrigarde.

Aperis ankaŭ noveloj de *Tom Frazer* kaj de *Victor Sadler*, kies eksperimenta prozo vekis multe da atento en la esperantistaj kulturaj revuoj.


6.8.2.3 *Noveloj kaj Skizoj.* — La norvega filologo *Johan Hammond Rosbach* (1921-), esperantisto ekde 1938 kaj kunlaboranto de *Norda Prismo*, elpaŝis en 1951 per la novelaro *Bagatelaro*, post kiu sekvis *Homoj kaj Riveroj*, 1957; *La Mirinda Eliksiro*, 1968, kaj *Disko*, 1970. La novelojn de Rosbach kunligas plejofte komuna rakontfadeno, kiu servas kiel preteksto por la fikcia rakonto. Kelkfoje tamen la manko de preciza tema malvolviĝo malutilas al la strukturo de la rakonto: tial estiĝas ne tiel sukcesaj libroj, kiel lia lasta. Lia lingvo estas simpla, familiara, neniam patosa aŭ iel perforta.


De la pola verkistino *Julia Pióro* aperis novelkolekto *El Tero kaj Etero*, 1964, kun simbolaj noveletoj, kies temaro neniam realisme konkretiĝas, sed trovas prezenton, disvolviĝon kaj formon en metafora kaj simbola atmosfero.


En 1965 aperis la amuz-satira novelaro *Tiaj ni Estas* de la Hungaro *Sándor Bakó*, kiu loĝas en Usono. Citinda estas ankaŭ la novelkolekto de la Finno *Eija Salovaara*, *Kie Boacoj Vagadas*, 1967; ĝi pritraktas okazaĵojn fikcie lokitajn en la lapona parto de Finnlando.

Kelkajn, parte ankaŭ valorajn novelojn sociverismajn aperigis la Italo *Sen Rodin*, ĉefe en *Monda Kulturo*. Rimarkindaj estas la noveloj de la ĉeha poeto *Štefo Urban:* li estas verkisto plurgama, kun talentaj observo- kaj priskribokapabloj. Liaj noveloj estas ofte delikataj lirikaj teksaĵoj sur forte sugestia rakontframo. De la Belgo *Albert Samyn*, kiu aktivis ankaŭ traduke, aperis kelkaj originalaĵoj. Kun intereso oni legas la novelojn de la Aŭstrino *Jolanthe Leser* (1910-), kies persontonaj, homecaj noveloj aperis plurrevue.

De alia Aŭstro, *Stefan Zodel* (1898-1963), industrioficisto, aperis valoraj noveloj, rakontoj kaj eseoj. Li verkis ankaŭ romanon, *Senkonsila Amo*, 1956, kiu tamen neniam aperis. Liaj noveloj estas kamparetosaj kaj montarpritraktaj. Riĉa estis la rakontfantazio de hungara mezlerneja instruisto *László Böti* (1914-1962), kiu aperigis sian prozon ĉefe en periodaĵoj. En la lastaj jaroj ekaperis originalaĵoj de alia Hungaro: *A. Szabó*. Ankaŭ de la talenta polo *Jerzy*







Supre maldekstre: Per *Vojaĝo al Kazohinio* Sándor Szathmári radioskopiis la nunan homan socion.

Supre: Ueyama masao alportis viglan prozan vervon el la Oriento.

Kiel Akvo de l' Rivero estas sukcesa provo de Raymond Schwartz – al la Esperanta prozo doni grandan romanon.

Grum (1933-), kunlaboranto de *La Suda Stelo* kaj *Norda Prismo*, aperis kelkaj noveloj, kiuj promesas pli maturan daŭrigon en definitiviĝinta stilo.

Novelojn kaj rakontojn publikigis la Ĉeĥo *Vladimír Váňa* (1932-), kiu ankaŭ multe tradukis, la Uzbeko *Petro Polišĉuk* kaj la hispanlingva Sudamerikano *Carlos Wappers* (en *La Paperoj de Wappers*, 1969). Eksperimentajn novelojn, stile ne tute maturajn, verkis la Hindo *Aŝvinikumar*, i.a. en *Monda Kulturo*. Menciinda estas la debuta novelo de *Geraldo Mattos*, *La Nigra Spartako*, 1955, kie li priskribas historie okazintan liberiĝan ribelon de grupo da negraj sklavoj. Plej lastatempe aperis, de *Bertram Potts*, la valora novelkolekto *Nokto da Timo*, 1971, kun verkoj maturaj kaj elegantaj. *Suno kaj Pluvo*, kolekto el 15 relative simplaj noveloj kaj skizoj de *Gudrun Riis*, aperis en 1972. Samjare aperis ankaŭ la skizaro de *F. Faulhaber*, *Faulhaber Rakontas* . . .

6.8.2.4 *Romanoj kaj Rakontoj.* — La plej granda hungara romanisto estas sendube la maŝininĝeniero *Sándor Szathmári* (1897-). Liaj noveloj aperis i.a. en *Belarto*, *Monda Kulturo*, *La Nica Literatura Revuo* kaj en la novelkolekto *Maŝinmondo*. En 1958 venis lia granda romano *Vojaĝo al Kazohinio* (jam preta en 1938), kie li satire skizas la problemojn de socio, kiu superis ĉiun psikologian alieniĝon, sed perdis la homan naturon. En la sino de tiu socio, tamen, troviĝas ankoraŭ aro da „malnovaj" homoj, kiujn la socio devas segregacii por mem ne perei. Tiuj „malnovaj" homoj satire simbolas la hodiaŭan homaron, sed ili akceptas ridindajn kaj nenormalajn tabuojn, dum la senalieniĝa socio estas la satira simbolo de la rezulto de scienco por si mem, kaj ne por la homo. Alia grava verkisto estis *Jean Ribillard* (1904-1962), franca majoro, kiu lernis Esperanton en 1948. Li verkis novelon *(Vagado sub Palmoj*, 1956), kaj la filozofian romaneton *Vivo kaj Opinioj de Majstro M'Saud*, 1963. Ĉi tiu ekzotika romaneto, bedaŭrinde nefinita, vigle kaj ironie priskribas la vivon de azeno en aŭtobiografia formo. La azeno, inter tiel multe da instinkte kaj neracie agantaj homoj, estas la sola reprezentanto de la vera homeca saĝo. Ribillard sciis elegante kaj vigle ĉerpi el la lingvaj latentoj de Esperanto, kreante tute personan, riĉegan stilon.

La Ĉeĥo *František Omelka* (1904-1960) postlasis *La Alaska Stafeto*, 1952, kiu enhavas samvolume la literature pli gravan *Kaptitoj de Glacirokoj*. De la dana kuracisto *H. L. Egerrup* aperis la romano *D-ro Dorner*, 1945, kiu priskribas la problemojn de artefarita fekundigo, plektita kun historio sufiĉe nekredebla, plena de hazardoj. De *Margid Thoraeus-Ekström* venis en 1967 *Brilo de Fantomo*, ra-

kontkolekto kun komuna fadeno pri la kampara bienvivo en Svedio. De la Svedo *Karl Lundqvist* aperis la amuza, literature senpretenda kriminalromaneto *Ferio kun la Morto* (2-a eld. 1962), kaj de lia samlandano *Ernst Olsson* romanecaj biografioj pri Sankta Birgitta, von Linné kaj Nobel en *Kredo, Floroj, Dinamito*, 1961. Alia Svedo, *F. T. Lundqvist* (1882-1965) publikigis la rakontkolekton *Ŝipestro Rakontas*, 1962. Aŭtobiografiajn verkojn sen literaturaj pretendoj aperigis *Jo van Hemert-Remmers: Sur Insulo Malproksima*, 1957 (pri la vivo en indonezia koncentrejo sub la japana regado), kaj la Finno *E. Rasku: Iu Finna Infanaĝo*, 1969. Aperis ankaŭ *Vojaĝimpresoj de Egipto tra Eŭropo kaj Azio per Esperanto*, de D-ro *Nassif Isaac*, 1967.

6.8.2.5 *Itala Skolo.* — La ĝis nun plej konata prozistino estas la torina instruistino *Clelia Conterno-Guglielminetti* (1915-), kiu kunlaboris al pluraj kulturaj gazetoj. Ŝiaj noveloj estas verve verkitaj, kaj ŝia sugestia talento, al kiu ŝi ofte kunigas piketan ironion, igas ilin tre personstilaj. Ŝi verkis ankaŭ multnombrajn kaj valorajn eseojn kaj studojn.

De la itala verkistino *Lina Gabrielli* aperis la prikongresa romaneto, romantikeca, *La Kombilo*, 1962, kaj kunlabore kun *A. Goldoni*, la porjunula rakonto *Bill kaj la Lazuraj Okuloj*, 1964. Inter la ĵus aperintaj „patrolanoj", interesaj estas la originalaĵoj de *Giorgio Silfer*, kiun distingigas atenta realisma observokapablo. Ili aperis en *Literatura Foiro*.

6.8.2.6 *Japana Skolo.* — En 1967 aperis la romanecaj biografioj de japanaj artistoj en *Pri Arto kaj Morto*, de la klera japana literaturisto *Miyamoto masao* (1913-). Du interesaj novelaroj de la novgeneracia verkisto *Ueyama masao* malkaŝas al ni la ekziston de tiu vigla, verva, skizema aŭtoro: liaj novelkolektoj estas *Ne Grimacu!*, 1967, kaj *Pardonon!*, 1970.

Sporade aperintaj estas la literature valoraj noveloj de *Konisi gaku* (1934-), kiu en 1971 eldonis kolekton el 5 noveloj sciencfantaziaj *La Kosmoŝipo „Edeno n-ro 5"*. Prinotinda estas la virinmovada aktivulino *Kita satori* (1923-), kiu ekverkis en Esperanto antaŭ proks. 20 jaroj, kaj menciinda ankaŭ la beletristika laboro de *Hukuta masao*.

6.8.2.7 *Jugoslavia Skolo.* — De *Ante Grgurina* aperis amuzaj, spritaj noveloj, parte aŭtobiografiaj, en *Ĉe Doktoro*, 1958. La jugoslavdevena Danino *Zora Heide* aperigis la novelaron *Ni Homoj* en 1970. Ŝi ĉerpas sian rakontmaterialon el siaj rememoroj pri la jugoslaviaj

nacia etoso kaj tradicia spiritvivo. Ankaŭ *Tibor Sekelj* iĝis konata kiel sporada rakontverkisto. *Du Noveloj* de *Branko Radakovic* aperis en 1955, samjare ankaŭ la novelo de *Božidar Trudić, Provinca Gastejo.* Noveloj lertastilaj kaj observoriĉaj aperis el la plumo de la jugoslavia ĵurnalisto *Željko Takač* (1927-), kiu lernis Esperanton en 1947. Kelkajn prozaĵojn, sufiĉe interesajn, verkis la poetino *Margarethe (Greta) Stoll.*

6.8.3 Teatro

6.8.3.1 *Hodiaŭa Situacio.* — La situacio de la Esperanta teatro estas multflanke malkontentiga. Se ni nuntempe posedas plurajn valorajn verkojn, kiuj tamen ne estas ankoraŭ kompareblaj al la nacilingvaj ĉefverkoj, se pluraj trupoj el profesiaj aktoroj nun programas ankaŭ en Esperanto kaj, se en la lastaj jaroj aperis multaj elstaraj teatraj tradukaĵoj (el Sartre, Shakespeare, Vildrac, Sofoklo, Molière, Pagnol, Machado de Assis, ktp.), tiam la originala teatra verkado sen videblaj kialoj lamas.

6.8.3.2 *Verkoj aperintaj.* — El la aŭtoroj de la dua periodo, verkis porteatre ankaŭ *Julio Baghy* kaj *Jakob D. Applebaum.* Pri iliaj verkoj ni jam parolis.

En la moderna Skota Skolo por la teatro laboris *William Auld,* kiu en sia volumo *Unufingraj Melodioj,* 1960, aperigis la versdramon *Kvazaŭ Birdoj Konstruas.* Temas pri teatraĵo interesa, en trafa kaj konciza, eleganta kaj klasika lingvo, sed eble ne sufiĉe drameca por la scenejo. Ankaŭ de la brazila verkisto *Geraldo Mattos* aperis la 4-akta versdramo *Ivan VI,* 1953, en tre romantika, jam tiutempe interesa, kvankam nematura lingvo.

Elstaraj estas ankaŭ la teatraj verkoj de *Marjorie Boulton,* kiu kolektis ilin en *Virino ĉe la Landlimo,* 1959. Ŝiaj multgamaj verkoj iras de la humura ŝerco, farso aŭ amuza unuaktaĵo, tra la ĉefe hodiaŭ valoraj radiodramoj, ĝis pli ambiciaj kaj ampleksaj versdramoj. El tiu kolekto 3 verkoj estis surscenigitaj. Unu *(Maneken-Parado)* eniris la repertuaron de IAT.

Amuzajn komedietojn verkis multaj aliaj aŭtoroj. De kiam ekzistas la drampremio de la Belartaj Konkursoj, ankaŭ radiodramoj estas pli ofte verkataj, kaj la nivelo de la unuaktaĵo plialtiĝis. Ni rimarkas i.a. la verkojn de *Emilija Lapenna* kaj de *Albert Samyn.*

Teatraĵeton verkis ankaŭ la Franco *Pierre Delaire, L'Edelvejso kaj la tri Vagabondinoj,* 1963, kaj la Meksikano *Francisco Azorín, Adamo kaj Eva,* 1954, ambician dramon en tri aktoj. Dum 1971 en Danio aperis kvar verketoj diversgrade interesaj: la psikologia dra-

mo de *Bukar, La Reto* (prezentita en Parizo dum novembro 1971), la simplaj skeĉoj de *Zora Heide, Ni Komedietas...*, la 4 unuaktaĵoj de *E. V. Tvarožek, Ni Ludas Teatraĵojn* kaj la tri komedietoj de *Marjorie Boulton, Ni Aktoras...* Tiuj eldonoj celas plialtigi la nivelon de programoj en la grupoj, kaj fakte sukcesas provizi aktoremulojn per interesaj originalaĵoj.

6.8.4 Satiraj Verkistoj

Aro da aŭtoroj verkis proze kaj poezie, parte por tutsimple amuzi la legantojn, parte por satiri pri homaj febloj, en kelkaj kazoj por elvivigi siajn kompleksojn. Estas fakto, ke multo, kio ekzistas en la Esperanto-Movado, same kiel en la mondo ĝenerale, povas inspiri ŝercemulojn. Satiraj verkoj povas rilati al homaj malfortoj ĝenerale, aŭ celi ekskluzive difinitan socian grupon, en nia kazo la Esperanto-Movadon, pli precize: kelkajn ĝiajn objektive negativajn aspektojn, aŭ fenomenojn, kiujn la aŭtoro mem, pro sia propra subjektiva starpunkto, emas kritiki.

Al la unua grupo apartenas la epigramecaj verketoj de la Germano *Stefan Maul*, aperintaj en *Po-emoj*, 1968, kaj en *Germana Esperanto-Revuo*. Ankaŭ *Adolf Sproeck*, kies satiroj aperis en *La Skurila Libro*, 1968, estas tiaspeca verkisto. En landaj gazetoj la Argentinano *Ruben Feldman-González* aperigis humurajn noveletojn. Sporade verkis tiukampe ankaŭ la Italo *Ademaro Barbiellini-Amidei* kelkajn bonajn noveletojn, kiuj aperis en *L'Esperanto*.

Povas okazi, ke la lingvo mem prezentas amuzajn, ĉar dusignifajn, kunmetaĵojn. La serĉo de tiaj vortoj, kaj ties kunligo en preskaŭ superrealisma teksto, kie ĉefis tamen ne ia ideo, sed nur lingva esprimvolo, estis la fako de *Mefi(s)tofilo*, kiu aperigis siajn elpensaĵojn en *Germana Esperanto-Revuo*. Tiaspecaj verkistoj troviĝas en ĉiuj landoj. Literaturajn pastiĉojn satircele verkis iu franca verkisto, kiu sin kaŝas sub la pseŭdonimo *Henri Baupierre* (1918-), laŭdire ĝardenisto. Li publikigis siajn pastiĉojn en *Specimene*, 1962, kie li serĉimite aperigis poemetojn kaj noveletojn en la stilo kaj kun la kutimaj temoj de pluraj verkistoj, tamen laŭ alekstreme tiritaj apartaĵoj, por efikigi la satiron. Li aperigis ankaŭ novelojn. Tute alispeca estas la germana aŭtoro *Kanguruo*, kiu en 1967 aperigis en *Germana Esperanto-Revuo* serion da satiroj pri apartaj ecoj de la Esperanto-Movado. Libroforme, aperis kelkaj pecoj en la broŝuro *Kiel (Mal)venkigi Esperanton*, 1968. Iom analoge verkas, kvankam ne tiel morde, kaj ĝenerale preskaŭ ĉiam pri lokaj kaj landaj movadaj problemoj, la Italo *Ermigi Rodari* (ps. Ermes), kies paĝoj aperas regule en *L'Esperanto*. En 1970 aperis la ilustrita kolekto el

maldecaj anekdotoj kaj spritaĵoj de *Louis Beaucaire: Kruko kaj Baniko el Bervalo.*

6.8.5 Kulture Gravaj Verkistoj

Estas praktike neeble listigi ĉiujn, kiuj verkis prilingve aŭ priscience en Esperanto. Kelkaj tamen estis rimarkindaj stilistoj, kaj riĉe kontribuis al la evoluo kaj firmigo de la lingvo.

Multaj, kiuj ankoraŭ nun verkas, komencis jam antaŭ la Dua Mondmilito. Inter ili la unuan lokon okupas *Kalocsay,* kiu ankoraŭ nuntempe abunde tradukas kaj prilingve verkas. La samon oni povas diri pri *Gaston Waringhien.* Pri li, tamen, konvenas aldoni, ke liaj plej gravaj verkoj prilingvaj kaj tradukaj aperis ĝuste post la Dua Mondmilito. Pri ambaŭ vidu antaŭe. Rimarkinda figuro restis ankaŭ post la Dua Mondmilito *Edmond Privat,* bona oratoro kaj verkisto de internaci-politikaj libroj. Sur la ĵurnalisma kampo aktivadis dum jardekoj *Teo Jung,* la fondinto de *Heroldo de Esperanto.*

En la lastaj 25 jaroj kiel aparta figuro elstaris *Ivo Lapenna* per sia multflanke influa agado. Li ne nur verkis centojn da artikoloj kaj grandan nombron da studoj, aperintaj en pluraj E-periodaĵoj, sed ankaŭ libroforme publikigis plurajn verkojn, el kiuj unu, lia ĉefverko, *Retoriko,* havis inter 1950 kaj 1971 tri eldonojn kun entute 6.200 ekzempleroj. Liaj kongresaj festparoladoj kaj oftaj prelegoj grave kontribuis al la evoluigo de la parola lingvo, donante tiamaniere al la Esperanta kulturo novan, ekster-kabinetan dimension.


Sed ankaŭ novaj fortoj ekaperis. El la lingvoanaliza kaj literaturhistoria vidpunkto elstaraj estas la studoj de *W. Auld* pri la lingvo kaj la literaturo Esperantaj. Auld havas seriozan analizan sintenon rilate la lingvon kaj la literaturon, al kiu li tiel multe kontribuis. Liaj studoj aperis kiel dokumentoj de CED kaj en pluraj revuoj, i.a. en *Esperanto, La Nica Literatura Revuo,* ktp.

Marjorie Boulton kaj *John Francis* verkis valorajn studojn pri la literaturo de Esperanto, ĉefe pri la verkoj de Zamenhof. La biografia verko *Zamenhof,* pretigita anglalingve de Marjorie Boulton, kaj adaptita en Esperanto-versio, estas monumento de konscienca esplora laboro. Gravaj estas ankaŭ la lingvaj kaj literaturaj kontribuaĵoj de *Vilho Setälä* (1892-), kies sciencaj artikoloj aperis en *Fortoj de l' Vivo,* 1967. Prilingve abunde verkis ankaŭ la japanaj stilmajstroj *Matuba kikunobu,* kies traduka aktiveco kaj lingva esearo estas imponaj, kaj *Nakamura tazuo,* kiu kunlaboris per aparta studo en la *Simpozio pri -ata/-ita,* 1961, per tradukaĵo en *Rakontoj de Oogai,* 1962; li verkis originalan *Enciklopedieto Japana,* 1964, kaj kunredaktis *Japana Kvodlibeto,* 1965. Grava estas ankaŭ *Miyamoto masao,*


LA VIVO
de la
PLANTOJ
de
PAUL NEERGAARD
DESEGNAJOJ DE MADS STAGE


Ivo Lapenna
RETORIKO


ENCIKLOPEDIETO
JAPANA


NEPALO
malfermas la Pordon
TIBOR SEKELJ

kiu amplekse laboris traduke kaj sur lingva kampo kaj verkis ankaŭ originale.

La tradicio de stilistoj-sciencistoj tute ne perdiĝis. Male, krom la cititaj verkoj, aperis valoraj originalaĵoj de *Ivo Lapenna: Retoriko*, 1950 (2-a eld. 1958; 3-a eld. 1971), *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo*, 1952, kaj *Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj*, 1966. De *Tibor Sekelj*, esploristo kaj verkisto, aperis noveloj, poemoj, geografiaj artikoloj, kaj originala libro: *Nepalo Malfermas la Pordon*, 1959. De la dana doktoro pri agronomio *Paul Neergaard* aperis multaj prilingvaj (esperantologiaj kaj interlingvistikaj) artikoloj. Li estis ĉefredaktoro de *Esperantologio* kaj de *Sciencaj Studoj*, 1958. Li publikigis tri gravajn popularsciencajn verkojn en Esperanto *(Scienco kaj Pseŭdoscienco pri Heredo kaj Raso*, 1937; *Atakoj Kontraŭ Ĝardenplantoj*, 1954; *La Vivo de la Plantoj*, 1957), kiuj aperis poste ankaŭ en pluraj tradukoj. Notindas ankaŭ la artikolaro (kun poemoj) de *Manuel Fernández-Menéndez*, aperinta en *La Homo sur Sia Vojo*, 1965.

Ne forgesenda estas la Hispano *Juan Régulo-Pérez*, katedra profesoro pri Esperanto en la Universitato de La Laguna, kiu verkis multnombrajn studojn pri lingvaj kaj esperantologiaj problemoj kaj kiu iniciatis kaj gvidas la eldonejon Stafeto (ekde 1952).

La literaturkritika diligenteco de la skotaj poetoj kaj la entreprenemo de la eldonejo de Régulo-Pérez faciligis la aperon de du mejloŝtonaj verkoj.

La unua estas *Esperanta Antologio 1887-1957*, redaktita de William Auld, kiu prizorgis ankaŭ ĝian enkondukon. Ĝi aperis en 1958, kaj prezentis poemojn de naŭdeko da poetoj el ĉiuj tri periodoj. Ĝi estas ege valora trezorejo de la plej valoraj gemoj de la Esperanta poezia literaturo, kaj verko nepre profunde studenda de ĉiuj interesatoj.

La dua estas *33 Rakontoj (La Esperanta Novelarto)*, antologia verko redaktita de Szilágyi kaj Rossetti, kaj kun enkonduko de Ivo Rotkvić. Ĝi prezentas 33 novelojn de 29 aŭtoroj el 17 landoj.

6.9 ESENCA BIBLIOGRAFIO

Auld, William (red.), *Esperanta Antologio 1887-1957*. La Laguna 1958.

Boulton, Marjorie, „L. L. Zamenhof, pionira poeto". Lapenna, Ivo (red.), *Memorlibro*. Londono 1960, p. 46-49.

Dalmau, Delfí, *Aclariments lingüístics*. Barcelona 1962.

Drezen, Ernest, *Historio de la mondolingvo*. Oosaka 1967.

Francis, John, „Integro kaj latentoj en la verko de Zamenhof". Lapenna, Ivo (red.), *Memorlibro*. Londono 1960, p. 50-53.

Hagler, Margaret, *The Esperanto language as a literary medium. A historical discussion of Esperanto literature, 1887-1970, and a stylistic analysis of translated and original Esperanto poetry.* Bloomington, Ind. 1971.

Kralj, Drago, *Kvar prelegoj pri Esperanta literaturo.* Ljubljana 1960.

Middelkoop, A. J., *Humoristische trekken in de Esperanto-literatuur.* Amsterdam 1969.

Pechan, Alfonso (red.), *Gvidlibro por supera ekzameno.* Vol. 2. Budapest 1966.

Rossetti, Reto; Szilágyi Ferenc (red.), *33 rakontoj (La Esperanta novelarto).* La Laguna 1964.

Totsche, Ludoviko, *De paĝo al paĝo.* Budapest 1932.

Waringhien, Gaston, *Eseoj.* La Laguna 1956.

ĈAPITRO 7

TRADUKA BELETRO

7.1 ENKONDUKO

En la lingva kaj tradicikrea kadro de la kultura signifo de Esperanto elstaras la tradukliteraturo.

Jam en la *Unua Libro* (1887) L. L. Zamenhof aperigis tradukitajn poemojn de Heine; la unua Esperanta revuo, *La Esperantisto*, havis ĉiunumere literaturan rubrikon. Verŝajne ĉe la unuaj Esperantaj poetoj eminentis la neceso provi la esprimkapablojn de la nova lingvo, trovi ĝiajn latentojn kaj testi la proprajn fortojn. Pro tio ni ne miras, kiam ni konstatas, ke Grabowski (poezie) kaj Kabe (proze) laboris preskaŭ ekskluzive traduke. Ankaŭ la poezia, teatra kaj proza verkaro de L. L. Zamenhof enhavas preskaŭ nur tradukitajn verkojn (kun la escepto de la leteroj kaj de la paroladoj).

Estas fakto, ke, kiam originala verkisto troviĝas antaŭ stila aŭ esprima malfacilaĵo, li povas ĝin eviti, simpligante aŭ eĉ forlasante la dirotaĵon. Sed la samon ne povas fari tradukisto, kiun ligas ne nur la senco, sed grandparte ankaŭ la formo de la tradukenda originalo.

Tiamaniere, dank' al la tradukliteraturo, formiĝis literatura faklingvo. La ĉefaj latentaj apartaĵoj de Esperanto estis malkovritaj, stilo fiksiĝis, diferencaj lingvo-efektiloj kaj stilrimedoj tradiciiĝis, kvankam ĉio ĉi estis formulita resume — almenaŭ koncerne poetikon — nur post 1920.

Tiu procezo daŭris fakte ĝis post la Unua Mondmilito. Tiam, la literaturaj lingvoj kaj la baza tradicio estis pretaj. Kaj ĝuste tiam komenciĝis la ekfloro de la originala literaturo.

Sed ne pro tio la tradukliteraturo malaperis: ĝi nur fariĝis pli celkonscia. Krome ĝi havis ekde tiu momento „konkurencanton" rilate la lingvo-modlon: la originalan literaturon, kun kiu cetere ĝi rilatas tra reciprokaj influoj.

Estiĝis tiam la konscio, ke internacia lingvo devas kaj povas peri fremdlingvajn literaturajn trezorojn en akurataj tradukoj, kiujn ebligas la fakto, ke la tradukanto ĝenerale parolas denaske la lingvon, el kiu li tradukas.

Cetere, pluraj bonegaj lingvo-artistoj ne kapablas memstare verki originale, kaj krome multaj talentaj aŭtoroj preferas sin elprovi traduke antaŭ ol verki originale, aŭ de tempo al tempo dediĉi sian lerton al la tradukado. Ne ĉiuj: W. Auld, G. Mattos, E. de Kock, M. Boulton, J. Baghy, R. Schwartz neniam tradukis, aŭ nur hazarde kaj pro momenta neceso.

Se ni komparas la nivelon de la Esperantaj tradukoj (konsiderante ĉefe tiujn, kiuj aperis post 1925) kun la tradukoj, kiuj aperas nacilingve, ni facile konstatas, ke fiere ni povas aserti, ke la meza kvalito de niaj tradukoj nepre superas la mezan kvaliton de la nacilingvaj tradukoj.

Kiam oni parolas pri tradukliteraturo, oni tre ofte renkontas la demandon: *ĉu la traduko de literaturaĵoj estas entute ebla?*

Se la lerno de lingvo signifas lernon de nova pensmaniero (t.e. de apliko de novaj penskategorioj), tiam lerno de Esperanto signifas lernon de kategorioj propraj al la lingvosistemo Esperanto. Do la traduko de esprimaĵoj el unu pensokategoria al alia pensokategoria sistemo ŝajnas ebla, se ni supozas, ke ambaŭ kategori-sistemoj estas perfekte konataj: fakte, ankaŭ se ambaŭ kategorio-sistemoj ege malsimilas inter si strukture, ili tamen respegulas esence saman mondon, kaj esence saman primaran mondpercepton.

Teknike, sencfidelan tradukon en Esperanton ebligas la lerto de la tradukanto kaj la avantaĝoj de la Esperanta lingvosistemo: unue, oni tradukas el la propra nacia lingvo; due, Esperanto havas elvokivajn kapablojn, trie, la nuanchavan esprimon ebligas la facila kaj analogiriĉa lingvostrukturo; kvare, la lingvo estas preciza kaj prezentas grandan flekseblecon en la frazkonstruo; kvine, ĝi estas rim-riĉa (laŭ W. Auld).

La rezulto de la traduka aktivado el la kvanta vidpunkto estas impresa, kaj havas nekontesteblan signifon. Laŭ *Index Translationum* de Unesko, inter 1957 kaj 1966 aperis tradukoj en la tuta mondo, el kiuj 70% venas de nur 4 lingvoj (la angla, la rusa, la franca kaj la germana). En la sama periodo aperis 344 tradukaĵoj Esperantaj el 28 lingvoj (el kiuj 207 estis libroj kun minimume 50 paĝoj). La plej gravaj fontolingvoj de la Esperantaj tradukoj estis la ĉina (103), la

vjetnama (33), la nederlanda (23) kaj la japana (22), kiuj ampleksas sume tamen apenaŭ pli ol 50% de la tuto.

7.2 ĈEFAJ VERKOJ

7.2.1 El la Albana Literaturo


El la albana aperis nur du verkoj, ambaŭ biografiaj. La unua, de Cuk Simoni, titoligas *Skanderbeg, Heroo de Albanujo* (1929). La dua, de Kristo Frashëri, estas *Gjergj Kastrioti-Skanderbeg (1405-1468)*, tradukita en Esperanton de Gafur Muço kaj Vasil Pistoli (1967).

7.2.2 El la Anglaj Literaturoj

El la angla literaturo 1887-1914: Unu el la plej malnovaj verkoj estas sendube la tragedio de Shakespeare *Hamleto,* aperinta en 1894 en traduko de L. L. Zamenhof. Temas pri verko, kiun la Francoj nomus „la belle infidèle", poezie kaj literature valora, sed kiu kelkfoje ne ĝuste redonas la originalan sencon. Tiu traduko havis grandan kaj daŭran sukceson: ĝia 8-a eldono aperis en 1964. De Shakespeare aperis ankoraŭ *La Ventego* (tr. A. Motteau), 1904, *Julio Cezaro* (tr. Lambert), 1906, kaj *Makbeto* (tr. Lambert), 1908: ĉi tiuj lastaj impresas iom prozecaj. *Kiel Plaĉas al Vi* aperis en 1910 en traduko de Ivy Kellerman. Siatempe tre laŭdata kaj ŝatata estis ankaŭ *La Venecia Komercisto* (tr. A. E. Wackrill), 1914. De Byron, jam tre frue, en 1896, aperis la poemo *Kain* (tr. A. Kofman), de la sama aŭtoro poste *Ĉielo kaj Tero* (tr. E. Noël), 1906, *Parizina* (tr. V. da Silva), 1912, kaj *Manfred* (tr. V. da Silva), 1914, drampoemo. Tamen, nur post 1904 komenciĝis iom regula eldonado de elangligitaj tradukaĵoj. La komedieto de Goldsmith (tr. A. Motteau) *Ŝi Kliniĝas por Venki* aperis en 1904, kaj en 1905 *Kristnaska Sonorado* de Ch. Dickens (tr. M. Westcott). De la sama aŭtoro aperis elĉerpaĵoj el la romano *Pickwick Papers,* dramigitaj kaj tradukitaj de W. Morrison (1907), kaj *La Batalo de l' Vivo* (tr. L. L. Zamenhof: libroforma eldono de traduko aperinta en *La Esperantisto* en 1891), 1910. *Gvinevero* kaj aliaj poemoj de Tennyson (tr. Cl. Bicknell) eldoniĝis en 1906, kaj en 1914 *In Memoriam* (tr. A. Styler). De T. Macaulay aperis la poezia verko *Horacio* (tr. Cl. Bicknell), 1906. En 1909 venis la verko, iom mallongigita, *Gulliver en Liliputlando,* de J. Swift (tr. Inman), kaj la postan jaron (1910) aperis *La Aventuroj de Alicio en Mirlando,* de Lewis Carroll (tr. Kearney). Bone tradukita estas

la rakonto de Stevenson *D-ro Jekyll kaj S-ro Hyde* (tr. Morrison kaj Mann) en 1910. Samjare traduke debutis H. J. Bulthuis per *Salome,* komedio de Oscar Wilde. En 1911 aperis la historia romano de Wiseman, *Fabiola* (tr. Milsom; 2-a eld. reviz. 1928). 1908 alportis krome *Robinsono Kruso* de Daniel Defoe. De J. Ruskin aperis la rakonto (tr. Ivy Kellerman) *La Reĝo de la Ora Rivero,* 1911 (2-a eld. 1926). La postan jaron venis de T. Gallon la verko *Tatterley* (tr. A. Wilson). De H. T. Craven aperis la familia dramo *La Kamena Angulo* (tr. Gordon), 1913.

El la angla literaturo 1915-1939: Dummilite aperis (1915) la teatraĵo de la humuristo Jerome K. Jerome *Barbra* (tr. Flora Hardcastle). En 1919 eldoniĝis *Ok Noveloj* de A. Bennett (tr. A. Wackrill). La postan jaron (1920) E. Payson aperigis la tradukon de du romanoj de Mabel Wagnalls: *La Rozujo Ĉiumiljara* kaj *Miserere.* De la sama aŭtorino aperis en 1926 ankaŭ la romano *Palaco de Dangero* (historia rakonto pri la Pompadour-epoko, tr. Payson). 1921 alportis novan tradukon el Shakespeare: *Sonĝo de Someromeza Nokto.* La tradukintino Louise Briggs sciis rekapti la originalan blankversan muzikon. De la sama aŭtoro aperis en 1924 *Reĝo Lear* (tr. Curry kaj Ashley), sed la valoro de la traduko ne estas elstara. 1928 donis refojan tradukon el Defoe: *Robinsono Kruso* (tr. H. Bulthuis): temas tamen nur pri traduko adaptita al infanoj kaj junuloj. El la verkaro de A. Cunningham aperis rakonto *La Hantataj Ŝipoj* (tr. Newell kaj Sturmer), 1928. Samjare aperis la antikvetosa romano de Rider Haggard *Luno de Izrael* (tr. Payson kaj Butler). De la sama aŭtoro aperis ankaŭ la romano *Ŝi.* H. G. Wells estis prezentita per tradukoj de tri romanoj: *La Dormanto Vekiĝas* (tr. F. Milward), 1929, kaj *La Tempo-Maŝino* kaj *La Lando de Blinduloj* (tr. E. W. Amos), samlibre, 1938. La romano de M. Saunders *Bela Joe* (tr. Blaikie kaj Hohlov) aperis en 1929. De Erica Maxwell (alias L. M. Pyke) aperis la romano *La Anstataŭa Edzino* (tr. Sampson), 1930. *Jane Eyre,* fama romano de Charlotte Brontë (tr. H. J. Bulthuis) eldoniĝis en 1931. En 1933 aperis nova traduko de *Gulivero en Liliputlando* de Swift (tr. Roos). En 1934 aperis verko de Ch. Dickens, *La Vivo de Nia Sinjoro Jesuo* (tr. M. C. Butler). La saman aŭtoron prezentis ankoraŭ 3 noveloj el la *Londona Skizlibro* (tr. Wadham), 1938. De la humuristo Jerome K. Jerome aperis *Tri Homoj en Boato* (tr. G. Badash), amuza rakonto, 1935. La *Romano de San Michele* de Axel Munthe (tr. J. Weleminsky) eldoniĝis samjare. En 1936 aperis *La Aventuroj de Marteno Drake,* porjunulara verko de G. Norway (tr. W. Severn). La postan jaron (1937) aperis la rakontaro de Chesterton *La Naiveco de Pastro Brown* (tr. C. Bean), krimromano de Agatha Christie *Murdo en la Orienta Ekspreso,* kaj



En la traduka beletro Shakespeare estas unu el la plej bone reprezentitaj klasikuloj de la monda literaturo.

romano de Wodehouse *La Princo kaj Betty* (tr. G. Badash). Fine, en 1938, venis la futurologia romano de E. R. Burroughs *Princino de Marso* (tr. K. R. C. Sturmer).

Angla literaturo 1939-1971: Post la Dua Mondmilito ree estis eldonitaj tradukoj el Shakespeare. Unu el la plej senlacaj tradukantoj estis St. Andrew. De li fontas *Romeo kaj Julieto* (1945), *Antonio kaj Kleopatro* (1947), *La Gajaj Edzinoj de Windsor* (1948), *Trojlo kaj Kresida* (1952). Malfeliĉe li tradukis proze, kaj krome cenzuris parton de la enhavo. La rezulto estas literature etnivela. Sed en 1960 aperis *Otelo* (tr. Reto Rossetti), brila ekzemplo de poezitraduka talento kaj forma kaj enhava fidelo. Ĉefverko estas ankaŭ la nova traduko de *Hamleto* (tr. L. N. M. Newell), 1964, kiu demonstras la intertempan moderniĝon kaj riĉiĝon de la Esperantaj lingvo kaj poezia arto. En mirige fidela kaj poezieca traduko de K. Kalocsay aperis en 1966 la tragedio de Shakespeare *Reĝo Lear.* De la sama tradukinto aperis ankaŭ *Somermeznokta Sonĝo* (1967), kaj, en 1971, *La Tempesto,* ambaŭ brile verkitaj.

Aperis cetere ankaŭ la romano de Freeman Wills Crofts *Morto de Trajno* (tr. M. Stuttard), 1948; la verketo de Stevenson *Diablet' en la Botel'* same estis publikigita en 1948. En 1970 oni eldonis la gravan politiksatiran romanon de G. Orwell, *La Bestofarmo* (tr. Gerald Tucker). Samjare aperis la kolekto de Philippa Galloway, *Skota Legendaro* (tr. Guy B. Tordoff).

Usona literaturo 1887-1972: De N. Hawthorne aperis *La Serĉado por Ora Ŝafl'ano* (tr. O'Connor kaj Hayes), 1906; *La Granda Vizaĝo el Ŝtono* (tr. Yelland), alegoria novelo, 1920. De W. Irving estis eldonitaj *La Abatejo de Westminster* (tr. O'Connor), 1906, kaj *La Legendo de Dorma Kavo* (tr. H. M. Scott), 1916. Postmilite aperis *La Legendo pri la Postlasaĵo de la Maŭro* (tr. L. Allen), 1923, kaj *El la Skizlibro* (tr. H. L. Elvin), kun i.a. *Rip van Winkle,* 1924. E. Allan Poe estas reprezentata per *La Puto kaj la Pendolo* (tr. Alex Pride), 1907; kaj *Ses Noveloj* (tr. Milward), 1924. De Mark Twain aperis novelo *La £ 1.000.000 Banka Bileto* (tr. Muschamp), 1907. De Jack London venis rakonto *La Forto de la Fortaj* (tr. K. Fröding), 1914; novelo *Ĥinago* (tr. Kalisky), 1924; *La Fera Kalkanumo* (tr. G. Saville), 1930: romaneca porsocialista pledo, kaj post la Dua Mondmilito la verko *La Balenodento* (tr. W. Auld). De Upton Sinclair aperis la romano *Jimmie Higgins* (tr. K. Fröding), 1934, kaj alia romano, *Petrolo* (tr. W. Bailey), 1936. Ankaŭ la mondfama rakonto pri la urso *Winnie-la-Pu* estis tradukita en la Internacian Lingvon, de Ivy Kellerman Reed kaj Ralph A. Lewin; eldonis ĝin en 1972 E. P. Dutton, la eldonejo de la originalo de A. A. Milne.

El la sudafrika (anglalingva) literaturo 1887-1971: St. Andrew

tradukis du klasikajn romanojn de Olive Schreiner: *Romano pri Afrika Bieno*, 1934, kaj *Undino*, 1938.

Verkoj antologiaj: Kromaj literaturaĵoj troviĝas traduke ne nur en multaj revuoj, sed ankaŭ en *Eterna Bukedo* (de K. Kalocsay), 1931. Antologiforman verkon skribis Clark: *Kien la Poezio?*, kun multaj ekzemploj el la angla literaturo. Elstara estas la *Angla Antologio*, 1957 (1-a volumo: anglaj aŭtoroj 1000-1800; sekvos volumo por la modernaj kaj por la skotaj aŭtoroj). Ĝin redaktis W. Auld (poezio) kaj R. Rossetti (prozo). Multaj kleraj tradukantoj aktive kunlaboris.

7.2.3 El la Antikva Greka Literaturo (Helena Literaturo)

La unua provo traduki el la helena estis farita de A. Kofman, kiu eldonis en 1895-97 la unuajn 4 kantojn de la *Iliado* (la 1-a kanto aperis ankaŭ en *Fundamenta Krestomatio)*. La dua provo traduki Homeron estis farita de D-ro W. J. A. Manders, kies proza traduko de *Odusseias* aperis en 1933. La herokomika poemo de aŭtoro nekonata, *Ranratbatalo* (tr. Deligny), estis eldonita en 1907.

El la filozofoj, nur Platono ekzistas en Esperanta traduko: lia majstra dialogo *Simpozio* (tr. Sokratis Sakellaropoulos) aperis en 1960 (2-a eld. 1967).

El la tragediistoj, ni posedas verkojn de Sofoklo. La unua sceno de *Reĝo Edipo* (tr. E. Préaubert) aperis en 1907, sed nur en 1960 oni publikigis la tutajn *Reĝo Edipo* kaj *Antigona* (tr. D. B. Gregor), samvolume.

Ezopo altiris la atenton de Esperantaj tradukistoj: jam en 1891 venis *50 Elektitaj Fabloj de Ezopo* (tr. Iv. Lojko). Ilin rerakontis Esperante Ossaka kenĵi *(Fabloj laŭ Ezopo*, 1932). Alia Japano aperigis Ezopan tradukaĵon: *50 Fabloj de Ezopo* (tr. Nakagaki koĵiro), 1954. Poezie rekreis ilin ankaŭ Kolomano Kalocsay: *Ezopa Saĝo*, 1955.

La komediistoj estas reprezentataj per unu sola komedio: *Ploutos*, de Aristofano (tr. E. Noël), 1906.

Interesa estas la verko de J. Penndorf *Grekaj Papirusoj Trovitaj en la Nila Valo*, 1927. La *Nova Testamento*, en traduko de komisiono de anglaj pastoroj, aperis la unuan fojon en 1912, kaj poste havis multajn eldonojn.

Dise, en la Esperanta gazetaro, oni povas trovi fragmentojn de multaj helenaj literaturaj verkoj. I.a. ni rimarkas verkojn de Alkeo, Anakreono, Eŭripido, Platono, Sapfo, k.a. Plej grandan rikolton liveras *Literatura Mondo* kaj *La Nica Literatura Revuo*. Ankaŭ la internaciaj antologioj, *El Parnaso de Popoloj* (Grabowski), 1913, kaj

Eterna Bukedo (Kalocsay), 1931, prezentas abundan kolekton el lirikaĵoj elhelenigitaj.

7.2.4 El la Araba Literaturo

El Lokman la Saĝa aperis novelkolekto *Arabaj Fabloj* (tr. A. Tellini), 1912. Sekvis elektitaj rakontoj el la araba versio de *Mil kaj Unu Noktoj*, 1927. Verko moralfilozofia estas *Arabaj Maksimoj de la 7-a Jarcento* (atribuataj al la Imamo Ali), tradukita de Husen Al-Amili, 1967. Sed la ĉefverko estas la plena traduko de *La Nobla Korano* (tr. Italo Chiussi), aperinta kun la originala araba teksto en apuda kolono en 1969. Poeziajn prozaĵojn kaj prozformajn poeziaĵojn de la monde konata libana verkisto Ĝ. Ĥalil' Ĝibran', *Rakontoj kaj Poemoj*, tradukis Georgo Abraĥam, 1972.

7.2.5 El la Armena Literaturo


V. Papazjan estas reprezentita per *Morituri Vos Salutant* (tr. G. Davidov), 1908, kaj *Rondaj Dioj* (tr. V. Sirunjan), 1910. La rakonto de A. Agaronjan *Guteton da Lakto* (tr. G. Davidov) aperis en 1907. La postan jaron (1908) aperis la verketo de Ajcatur *Armena Fabelo* (tr. G. Davidov). Rakonto de Avetis Aĥaronjan, *La Patrinoj* (tr. A. Fiŝer) eldoniĝis en 1912. Proksimume samepoke aperis en Saratov (Ruslando) antologiforma verketo *Armena Poezio*, tradukita de iu Narciso.


7.2.6 El la Bulgara Literaturo

La bibliografia verko *Bulgara Artliteraturo en Fremdaj Lingvoj 1823-1962* atentigas, ke la Internacia Lingvo estas, egale kun la franca, la tria plej grava lingvo por tradukado el la bulgara. Nur la rusa kaj la angla havas pli da tradukoj el la bulgara. Post Esperanto kaj la franca sekvas, laŭ tiu verko, 62 aliaj lingvoj malpli ofte uzitaj.


1887-1918: Libroforme en tiu ĉi periodo aperis nur *Bulgaraj Rakontoj* de Ivan Vazov (tr. Atanas D. Atanasov), 1910 (3-a eld. 1923). Pluraj literaturaĵoj aperis tamen en revuoj (el Daskalov, Stamatov, Vazov), tradukitaj ĉefe de Ivan Krestanov kaj A. D. Atanasov (ps. ADA).

1919-1939: Intermilite la bulgara literaturo en Esperanto konsiderinde pliriĉiĝis malgraŭ la tiama malfavora politika situacio. Aperis verkoj de la klasikuloj P. Slavejkov, Iv. Vazov, Ĥr. Botev, J. Jovkov, sed ankaŭ de modernuloj: i.a. G. Karaslavov, Ĥr. Smir-





La Nobla Korano digne reprezentas la araban literaturon, samkiel *Reĝo Edipo* kaj *Antigona* la helenan. A.D.Atanasov (supre) kompetente tradukis el la bulgara, kaj T.Pumpr (sube) el la ĉeĥa.





nenski, Geo Milev. Pleje tradukis Asen Grigorov, Atanas Lakov, Ĥrima, Iv. Dobrov kaj D. Sasonov.

La plej reprezentaj verkoj estas *Nuntempaj Rakontoj* de G. Stamatov, 1922, kaj, de la sama aŭtoro, *Vilao apud la Maro,* 1934, ambaŭ tradukitaj de Iv. Krestanov. De Elin-Pelin aperis la novelo *La Familio Gerak* (tr. A. D. Atanasov), 1924. *Novaj Bulgaraj Rakontoj* de Ivan Vazov (tr. G. Atanasov) aperis en 1928. De Ĥristo Smirnenski (tr. A. Grigorov, Lakov, Ĥrima) aperis la poemaro *Tra la Ventego* en 1931 (2-a eld. 1950); de Geo Milev (tr. Ĥrima, D. Sasonov) la poemo *Septembro,* 1931 (2-a eld. 1946); de G. Karaslavov la novelkolekto *Ĉe Posteno* (tr. Grigorov k.a.), 1932; fine de Jordan Jovkov (tr. Ĥr. Iskrov, Sasonov, k.a.) *Elektitaj Rakontoj,* 1938.

Bulgara Antologio, redaktita de Iv. Krestanov, aperis en la jaro 1925. La poezian parton de la antologio tradukis K. Kalocsay.

1940-1971: Post la Dua Mondmilito, la eldonado tute ne lamis: De Elin-Pelin (tr. Ĥesapĉiev) aperis *Elektitaj Rakontoj, 1948.* La rakonto *Vagabondoj* de Ivan Vazov (tr. Iv. Kovaĉev) aperis en 1949. En 1959 venis la granda, grava historia eposa romano de Ivan Vazov, *Sub la Jugo,* lerte tradukita de grupo beletrista sub la ĉefredakto de S. kaj A. Simeonov. De G. Karaslavov aperis la realisma historia rakonto *Bofilino* (tr. A. kaj S. Simeonov), 1959. La moderna poeto N. Vapcarov prezentiĝis per *Versaĵoj* (tr. Grigorov, S. Simeonov k.a.), 1960. Fine, de Ĥristo Botev aperis verko antologiforma (kun poemoj kaj prozaĵoj) *Elektita Verkaro* (tr. Iv. Dobrev, Iv. Sarafov, Gorov), 1969.

Enrevue, plej riĉan rikolton ni trovas i.a. en *Literatura Mondo, La Suda Stelo, La Nica Literatura Revuo, Monda Kulturo, Danubo, Nuntempa Bulgario, Bulgara Esperantisto.* Menciindas volumo antologikaraktera: *Bulgara Prozo,* 1960.

7.2.7 El la Ĉeĥa kaj Slovaka Literaturoj

1887-1920: La unua grava libroforma verko estas *Rakontoj* de J. Arbes (tr. Josef Grňa), 1908. Kolekton de poemoj tradukitaj oni eldonis post la morto de St. Schulhof: *Bohemaj Grenatoj,* 1920.

1920-1939: Nur intermilite povis libere floradi la literatura tradukado en Ĉeĥoslovakio. En 1921 aperis la triakta komedio de J. Vrchlický *Nokto en Karlův Týn* (tr. Miloš Lukáš). La verko de Jiří Mahen *La Koboldo Ondra* (tr. Moraviaj Esperanto-Pioniroj) aperis en la sama jaro (1921). De Karel Čapek aperis la dramo *RUR (Rossumaj Universal Robotoj)* (tr. Moraviaj Esperanto-Pioniroj), 1926, kaj en 1928 la dramo *La Blanka Malsano* (tr. Kilian). De Petr Bezruč aperis *Sileziaj Poemoj* (tr. Vl. Adamík), 1927. Verkoj de J. Her-

ben (1930), J. Welzl (1931), I. Herrmann (1932) aperis en traduko de Moraviaj Esperanto-Pioniroj. La samaj tradukis ankaŭ la novelojn *Genutrantoj* de Jiří Sumín kaj *Maryčka Danculino* de Růžena Svobodová, 1933. La romano de Ladisl. Vladyka *Mi en Li* (tr. Moraviaj Esperanto-Pioniroj) aperis en 1933. De K. M. Čapek-Chod aperis tri *Noveloj* (tr. Moraviaj Esperanto-Pioniroj), 1934. Samjare venis eltiraĵoj el la romano de J. Hašek *La Travivaĵoj de la Brava Soldato Ŝvejk dum la Mondmilito* (tr. J. Štádler), kaj la postan jaron (1935) aperis la satira verko de Petro Den *Kiel Fariĝi Kreanto Facile kaj Rapide* (tr. Moraviaj Esperanto-Pioniroj). En 1937 aperis la socikritika tragikomedio de Vilém Werner *Homoj sur Flosglacio* (tr. Moraviaj Esperanto-Pioniroj). Interesa estas la verko de K. J. Erben *Bukedo el Ĉeĥaj Naciaj Mitoj*, poemaro, tradukita de Tomáš Pumpr, 1938.

1940-1971: La nazia okupado kaj la milito unue, kaj poste la Stalin-a malpermeso multe influis lamige la eldonkapablon de la ĉeĥoslovakaj tradukemuloj. Ekster Ĉeĥoslovakio aperis en 1948 *Skizoj pri Nederlando* (tr. Degenkamp), bonhumoraj priskriboj de Karel Čapek. De la sama aŭtoro, en la brila traduko de Josef Vondroušek, aperis *Libro de Apokrifoj*, 1970: 29 novelminiaturoj kun mita temo. De K. H. Borovský aperis la longa, nefinita poemo satira *La Bapto de Caro Vladimir* (en brila traduko de Tomáš Pumpr), 1953. De Jaroslav Seifert aperis la versaĵkolekto *Panjo* (tr. Jiří Kořínek), 1960. *Ĉeĥajn Fabelojn* porinfanajn (tr. Valda Vinař) oni eldonis en Japanio (1962). La slovaka teatraĵo *Meteoro* (tr. V. Gazda) aperis en 1963: aŭtoro estas Peter Karvaš. La romano de Jan Otčenášek *Romeo, Julieta kaj la Tenebro* (en aparte bona traduko de V. Váňa), aperis en 1965. En 1968 aperis la traduko de la slovaka groteska teatraĵo de Ján Kákoš *Mohajra Plejdo* (tr. Ed. V. Tvarožek), kaj en 1970 *Sileziaj Kantoj*, poemaro de Petro Bezruč, en traduko de Pumpr, Kořínek kaj Hromada.

Multaj aliaj tradukaĵoj aperis en revuoj: i.a. en *Literatura Mondo, La Suda Stelo, La Nica Literatura Revuo.* La plej novajn tradukojn pretigis ĉefe Josef Vondroušek, Karel Píč, Jana Cíchová, Eva Seemannová-Suchardová, k.a. En 1935 aperis cetere *Ĉeĥoslovaka Antologio* (ĉefredaktoroj estis O. Ginz kaj St. Kamarýt), kun elstare reprezenta elekto de literaturaĵoj. Interesa el literatura vidpunkto estas ankaŭ la verketo de A. Novák (tr. V. Kroužil) *Ĉeha Literaturo laŭ la Birdperspektivo*, 1921.

7.2.8 El la Ĉerkesa Literaturo

Aperis malgranda antologieto de rakontoj en 1908, redaktita kaj tradukita de G. Davidov.

7.2.9 El la Ĉina Literaturo

1887-1949: En 1913 aperis la unuaj tradukaĵoj de K. Ĉ. Ŝan en *Orienta Almanako.* Tamen, nur post la Unua Mondmilito la tradukaĵoj el la ĉina komencis plimultiĝi.

Antologian formon havas la verko *Perloj el la Oriento,* 1921, de Ossaka kenĵi, kun klasikaj poemoj ĉinaj. La samo validas ankaŭ por *Verda Parnaso* 1932, de I.U. (pseŭdonimo de Ito saburo), kun ĉinaj poemoj el diversaj epokoj. El la *klasika* literaturo aperis komence *La Vortoj de Konfucio* (tr. Ossaka kenĵi), 1923. Pli poste eldoniĝis konfuciaj ĉefverkoj: *Granda Lernado* kaj *Doktrino de Mezeco* (tr. unubroŝure de Nohara kiuiĉi), 1932. En 1933 aperis etika libro el proks. 420 a.K.: *Librokonstantaĵo de Fila Pieco* (tr. Nohara). De la budhana sektofondinto K'uoan (12-a jarcento) aperis *La Dek Bildoj de Bovpaŝtado* (tr. Ŝibajama kei), 1930.

El la *modernuloj,* aperis la duakta historia dramo *Ribelemaj Virinoj* de Guo moĵuo (1892-), tradukita de Ŝ. M. Chun, 1927. En 1933 O. Erdberg aperigis *Ĉinajn Novelojn,* kiuj temas pri la revolucia kaj naciliberiga batalo.

1949-1971: Post la naciliberiga batalo, ĉefe *El Popola Ĉinio* aperigis klasikajn kaj modernajn tradukaĵojn. Kelkaj klasikaĵoj aperis ankaŭ en *El Orienta Florbedo,* de Ossaka kenĵi, 1956. Rakontojn de la 220-a p.K. ĝis 1911 kunigas *Rakontoj pri Fantomspitantoj* (1961). Rakontojn de la 13-a jarcento enhavas la verko de Vang ŝifu *La Okcidenta Ĉambro* (tr. Laŭlum), 1961.

Pli modernaj verkoj estas *Fajrolumo en la Fronto,* de Liu bejü (tr. S. J. Zee), 1951, kaj *Nova Tasko* (tr. Cicio Mar), 1950, noveloj primilitaj. La novelaro *Por Nova Afero Nova Maniero* (tr. Zee k.a.) aperis en 1952 (2-a eld. 1959), *La Feliĉo* (tr. Honfan kaj Zee) en 1953, kaj la poemaro *La Plej Forta Voĉo de la Paco* (tr. Zee), aperis en 1952. En 1960 estis eldonita rimarkinda moderna antologio *Ĉina Antologio 1949-1955* (tr. Zee, Laŭlum, Honfan, k.a.).

Bonaj estas ankaŭ la verkoj de Liu ĝaŭlin *Knabino kaj Garolo,* versa popolrakonto tradukita de Laŭlum (1962), kaj la verkoj de Ging fan *Kiel Lu Ban Majstriĝis,* 1963, kaj de Hie kiguj *La Varma Sudo kaj la Frosta Nordo,* 1966.

La versa popolrakonto de la Sani-a naciminoritato *Aŝma* aperis en bela traduko de Laŭlum (1964).

Sed la plej atentinda eldonaĵo estas la preskaŭ kompleta kolekto de *Noveloj de Lusin,* brile tradukitaj de Elpin, S. J. Zee, k.a. (1963). Lusin-tradukaĵoj cetere aperis jam en 1930, 1934, 1939, 1941 kaj 1951.

7.2.10 El la Dana Literaturo

1887-1918: Antaŭ la Unua Mondmilito la tradukoj estis nur sporadaj kaj impresis nemature. Tiam, la plej gravaj tradukantoj estis sendube F. Skeel-Giørling, H. Th. Thomsen (Norvego) kaj Kaj Bendix. La unua libroforma eldono estis *Prozo el Danaj-Norvegaj Aŭtoroj,* 1908, verko kunmetita de Thomsen. Samjare aperis la teatraĵo de H. Hertz *Jolanto, la Filino de l' Reĝo René* (tr. Hj. Runeberg). En 1909 aperis *Fabeloj* de Andersen (tr. Skeel-Giørling), 2-a eld. 1923. Tiu traduko signas la unuan manifestiĝon de la ŝato de la tradukistoj rilate Andersen, kiu igis ties verkaron en Esperanto tiel reprezentata.

1919-1941: Libroforme aperis jam frue *Fabeloj de Andersen,* tradukitaj de L. L. Zamenhof inter 1888 kaj 1914. La unua volumo aperis en 1923 (3-a eld. 1965), la dua en 1926, la tria en 1932 kaj la kvara en 1963. Krome aperis la rakonto de Steen Steensen Blicher *Taglibro de Vilaĝpedelo* (tr. H. J. Bulthuis), 1922, kaj la romano de Hans Kirk *Taglaboristoj* (tr. L. Friis kaj W. Jensen), 1941 (2-a eld. 1968). Estas rimarkinde, ke post 1930 venis renesanco en la dana tradukarto. Anonciĝis novaj, kleraj tradukantoj: H. P. Frodelund, P. Th. Justesen, H. E. Jensen, Kristian Langgaard, kiuj aktive kunlaboris en ĉiuj tiamaj gravaj literaturaj gazetoj.

1942-1971: Al tiuj tradukantoj aldoniĝis novaj rekrutoj: i.a. Aage Hunderup Petersen, E. Egerrup, E. Windeballe, Ib Schleicher, C. Graversen, kaj precipe Poul Thorsen, kiu kontribuis per 20% el ĉio tradukita (ĉefe verse).

Libroforme prezentiĝis pliaj tradukaĵoj el Andersen: Noveloj (tr. Frodelund), 1946, (tr. Hugo Sirk) 1953, kaj ĉefe *La Marvirineto,* 1962, kaj *La Novaj Vestoj de la Imperiestro,* 1964, ambaŭ tradukitaj de Ib Schleicher. Aperis alia verko de Steen Steensen Blicher: *La Pastro en Vejlbye* (tr. Aage Hunderup Petersen), 1945, *Misteroj de l' Vivo,* novelaro de Agnes Bøgh-Høgsted (tr. C. Graversen), 1950, kaj *Pli ol Fantazio,* de la sama aŭtorino, 1946 (2-a eld. 1967). P. Thorsen tradukis en 1956 la karikaturajn, epigramecajn aforismojn de Piet Hein, *Gruk,* kaj grupo sub la ĉefredaktoreco de Svend Dragsted tradukis la romanon de Willy Risør *Tiel Profunda Estas la Nokto,* 1959.

Parto de la volumoj de Poul Thorsen *Rozoj kaj Urtikoj,* 1954, kaj *Sen Paraŝuto,* 1963, konsistas el tradukitaj poemoj.

Grandan signifon havas la publikigo en 1961 de la *Dana Antologio.* Multaj tradukoj el la dana aperis en *Norda Prismo* aŭ estis prezentitaj dum la Belartaj Konkursoj.

Bibliografion pri la dana literaturo en Esperanto verkis P. Thorsen en 1952 (kun 355 titoloj de 94 aŭtoroj) kaj danlingve ankaŭ Svend Dragsted en 1962 (kun 471 titoloj).

7.2.11 El la Estona Literaturo

De la reprezentanto de la literatura skolo novestona Fr. Tuglas aperis *Kvin Noveloj*, 1924, tradukitaj de Seppik.

Verko de la moderna revolucia poeto Johannes Barbarus *Horizontoj* (tr. Hilda Dresen) aperis en 1931. 1929 alportis poemaron *Elektitaj Versaĵoj* de Marie Under, en tre bona Esperanta versio pretigita de Hilda Dresen. Post la Dua Mondmilito aperis du verkoj: *Ŝippereo*, novelo kaj versaĵoj de Juhan Smuul (tr. H. Tulve), 1968, kaj 14 noveletoj de Lilli Promet, *Kuŝanta Tigro* (tr. Alma Lekko), 1971. En la ĉefaj postmilitaj literaturaj gazetoj aperis, dank' al la nelacigebla aktivo de H. Dresen, tradukaĵoj el Vaarandi, M. Rand, J. Smuul, V. Beekman.

En 1931 aperis ankaŭ kolekto *Ekskursa Kantaro*, kaj en 1932 *Estona Antologio*, kiun ĉefredaktis Hilda Dresen, kunlabore kun 16 aliaj kleraj tradukantoj.

7.2.12 El la Finna Literaturo

Inde reprezentas la finnan literaturon jenaj verkoj de Aleksis Kivi: *La Fianĉiĝo* kaj *Lea*, ambaŭ drametoj (tr. Hilma Hall), 1920; *La Bĉtistoj*, kvinakta komedia dramo (tr. H. Hall), 1919, *Sep Fratoj* (tr. Ilmari Ekström), prozforma eposo prikampara, 1947.

De Linnankoski aperis *Batalo pri la Domo Heikkilä* (tr. V. Setälä), 1919. V. Setälä aperigis en 1950 la fotografaĵ-kolekton *Burĝonoj*, kun tradukitaj poemoj. Sed la plej elstara verko, forme kaj enhave eksterordinare fidela, estas sendube la traduko de la nacia eposo *Kalevala*, 1964. Temas pri la vivo-verko de J. E. Leppäkoski, kiu tiamaniere testamentis la eposon al la poezia trezoro de la Esperanta kulturo. La poemaro de J. H. Erkko *Spegulo Homarana* aperis en 1946 en traduko de Vilho Setälä. La sama tradukinto aperigis tradukaĵojn ankaŭ en *Fortoj de l'Vivo*, 1967.

7.2.13 El la Flandra Literaturo

Belgio estas, kiel konate, lando dulingva. Ni pritraktas ĉi tie la flandran literaturon, dum la valonan ni pritraktas en la ĉapitro pri la franca literaturo.


1887-1914: Antaŭ la Unua Mondmilito la flandraj beletristoj estis tre aktivaj: jam en 1904 aperis plene reprezenta antologia volumo *Paĝoj el la Flandra Literaturo,* redaktita kaj tradukita de M. Seynaeve kaj R. van Melckebeke, kun la verkoj de 21 aŭtoroj. Du rakontoj de Hendrik Conscience *Blinda Rozo* (tr. v. Melckebeke kaj v. Hove), 1906, kaj *Rikke-Tikke-Tak* (tr. M. Posenaer), 1912, aperis libroforme. De René Vermandere aperis *Formortinta Delsuno* (tr. O. van Schoor), 1910. P. H. Spaak prezentiĝis per la teatraĵo *Kaatje* (tr. W. v. d. Biest), 1911, kaj de Maurits Sabbe aperis ankaŭ teatraĵo, *Bietje* (tr. W. v. d. Biest), 1914. Aliaj tradukoj aperis en revuoj. Ilin pretigis ĉefe Fr. Schoofs, Maria Posenaer, A. kaj W. van der Biest, Oscar van Schoor, k.a.

1915-1939: Post la Unua Mondmilito aperis alia grava reprezenta verko: la *Belga Antologio* (flandra parto, 1928), kiun tradukis grupo el la pioniraj tradukantoj, al kiuj aliĝis novaj aktivuloj: H. Vermuyten, Jan van Schoor, Fr. Schoofs, L. Cogen, k.a. La gravan romanon de H. Conscience *La Leono de Flandrujo* tradukis la Nederlandano H. Bulthuis (1929). En 1931 aperis *Elektitaj Noveloj* de Lode Baekelmans (tr. J. van Schoor). Ankaŭ la romano de F. Timmermans *Pallieter,* 1933, estis tradukita de J. van Schoor. Fine, en 1939, aperis en traduko de H. Vermuyten bona versio de poemaro de Guido Gezelle *Se Aŭskultas la Animo*....

1940-1971: Post la Dua Mondmilito la literatura libroeldonado en Flandrio iom lamis; tamen aperis ĉefe en revuoj kaj en belartaj konkursoj kelkaj novaĵoj. La plej interesa moderna tradukisto estas Albert Samyn, dum la plej fertila estas frato Arni Decorte, kiu tamen limiĝas preskaŭ komplete al la literaturo religia.


7.2.14 El la Franclingva Literaturo

1887-1914: La unua libroforma verko estas la kvinakta komedio de Beaumarchais *La Edziĝo de Figaro* (tr. A. Kofman), 1898. De la sama aŭtoro aperis ankaŭ *La Barbiro de Sevilla* (tr. S. Meyer), 1909. En 1902 aperis la fabelo de Pierre Louÿs *La Rozo Supernatura.* 1904 alportis la verkon de X. de Maistre *Vojaĝo Interne de Mia Ĉambro* (tr. S. Meyer). De la sama aŭtoro aperis la rakonto *La Leprulo de Aosto* (tr. Assis Moura), 1908. En 1904 venis ankaŭ la triakta farso *Advokato Patelin,* de Brueys kaj Palaprat (tr. J. Evrot). Samjare



J.P.Leppäkoski riĉigis la tradukan beletron per la grandioza finna eposo *Kalevala.*





Kalocsay—Waringhien, la genia duopo, kiu en la Internacia Lingvo brile redonis la majstroverkojn de Heine kaj Baudelaire.

aperis *Elektitaj Fabloj* de La Fontaine (2-a eld. 1907), tradukitaj de G. Vaillant. De Sam Meyer estas la traduko de *L'Avarulo* de Molière (1904). De la sama aŭtoro, en la sama jaro, aperis *La Edziĝo Kontraŭvola* (tr. V. Dufeutrel). En 1906 aperis *Don Juan* (tr. Boirac), kaj en 1908 *Georgo Dandin* (tr. L. L. Zamenhof), 2-a eldono 1924. En 1911 eldoniĝis la traduko de *La Malsanulo pro Imago* (tr. Velten).

La jaro 1904 alportis ankaŭ la volumon *Rakontoj pri Feinoj* de Perrault (tr. Sarpy), 4-a eld. 1908. De Maupassant aperis la rakonto *Gastejo* (tr. Gogitidze), 1911. En 1905 aperis la romano de Bernardin de St. Pierre *Paŭlo kaj Virginio* (tr. H. Hodler). Komedieto de d'Hervilly *La Supujo* (tr. S. Meyer), aperis en 1905. En 1906 venis la ampleksa poezia traduko de la *Rolandkanto*, pretigita de D-ro Noël. Samjare aperis du tragedioj de Racine: *Atalia* kaj *Ester* (2-a eld. 1907), tradukitaj de E. Noël. En 1907 eldoniĝis *Aventuroj de l'Lasta Abenceraĝo* de Chateaubriand (tr. R. Deshays). De Flaubert aperis *La Legendo de S. Juliano Helpema* (tr. H. Hodler), 1907. Samjare aperis ankaŭ: la verketo de Octave Mirbeau *Ili Estis Frenezaj* (tr. Segrétinat), la romano de J. Renard *Karotharulo* (tr. Muffang), la verko de Courteline *Sinjoro Badin* (tr. R. Beck kaj R. Jean), la teatraĵeto *Angla Lingvo sen Profesoro* (tr. G. Moch) de Tristan Bernard, *La Vivo de Jesuo* de Renan (tr. E. Gasse), kaj *Sinjoro Vento kaj Sinjorino Pluvo* de Paul de Musset (tr. Champion). De lia frato, Alfred de Musset, aperis *Kaprico* (tr. Flourens), 1908, la duakta komedio *Fantasio* (tr. P. Berthelot), 1911, kaj *Ne Ludetu kun la Amo* (triakta komedieto, tr. Stroele), 1911. Tre ŝatata estis la romaneto de J.J. Porchat *Sub la Neĝo* (tr. J. Borel), 1908 (2-a eld. 1923). Samjare (1908) aperis la verko de Houssaye *La Reĝlando de l'Rozoj* (tr. Champion), la unuakta komedio de A. Dreyfus *La Vangofrapo* (tr. S. Sar), la verko de Abbé Prévost *Manon Lescaut* (tr. Vallienne) kaj *La Kaprino de S-ro Seguin*, de A. Daudet (tr. Yersin). Oni publikigis en 1909 la verkon de A. Dumas *La Kolomba Premio* (tr. B. Papot). En 1909 aperis rakonto de Honoré de Balzac: *Eŭgenino Grandet* (tr. E. Gasse). De la sama aŭtoro aperis ankaŭ *La Vendetta* (tr. M. Merckens), 1911. La verko de Fénelon *La Aventuroj de Telemako* (tr. Vallienne) eldoniĝis inter 1909 kaj 1910. En 1910 aperis la teozofi-fona romano de L. Dalsace *Fatala Ŝuldo* (tr. E. Ferter-Cense) kaj de Maeterlinck oni eldonis *Monna Vanna* (tr. A. Behrendt). De la sama aŭtoro aperis *Morto de Hundeto* (tr. G. Stroele), 1912, kaj *Aladino kaj Palomido* (tr. Eliot) 1913.

En 1911 aperis la *Funebra Parolado pri Louis de Bourbon* (tr. L. Bastien), de Bossuet. De la sama aŭtoro venis ankaŭ la *Unua Katekismo* (tr. P. Deschamps), 1913. En 1911 aperis la rakonto *Karmen* de Prosper Mérimée (tr. S. Meyer) kaj la romano de la Sviso Ramuz

Aline (tr. de Saussure). Elĉerpaĵoj el *Gil Blas de Santillana,* romano de Lesage, aperis en 1912 (tr. Busquet). En 1914 publikiĝis la *Intervidiĝo* kaj *la Nekonita Dialogo,* de De Vigny, ambaŭ tradukitaj de S. Meyer (2-a eld. 1924). 1914 alportis la romanon de Paul Seippel *Adèle Kamm* (tr. R. de Saussure, 2-a eld. 1915). Samjare aperis la tragedio *Sokrato* de Ch. Richet (tr. J. Couteaux). De M. Zamacoïs aperis la kvarakta versa teatraĵo *La Amuzistoj* (tr. W. v. d. Biest), 1913, kaj la traduko de la unua parto de la romano *La Mizeruloj* de Victor Hugo venis en 1914-1915.

1915-1939: Kvankam postmilite Francio ne plu estis la centro de la Esperanta Movado, aperis tamen multaj verkoj tradukaj. Antologiforme aperis nenio, sed en 1928 la franclingva (valona) parto de *Belga Antologio* (red. M. Jaumotte) kaj en 1939 la velŝa (romanda) parto de la *Svisa Antologio* (red. A. Baur) sciis valorigi la franclingvan literaturon ekster Francio. Ankaŭ en *Eterna Bukedo* (tr. Kalocsay), 1931, troviĝas 37 poemoj elfrancigitaj. En 1921 aperis *La Pensoj de Riquet* (tr. G. Moch) kaj *Thais* (tr. S. Payson) de Anatole France. En 1922 venis retraduko de la farso *Majstro Pierre Pathelin* (tr. Balliman). Samjare aperis *Francaj Poezioj* (tr. Balliman). En 1922 Henri Legrand tradukis *Amfitriono,* komedio de Molière. De la sama aŭtoro aperis *La Mizantropo* (tr. H. Boucon), 1930, kaj *La Nobela Burĝo* (tr. R. Levin), 1936. La Jaro 1923 alportis la romanon de H. Barbusse *Eklumo en la Abismo* (tr. Else). La novelo de H. Balzac *La Firmao de la Kato kiu Pilkludas* (tr. P. Benoit) aperis en 1924. De P. Mérimée aperis *Mateo Falcone* (tr. J. Borel), 1926, kaj *Colomba* (tr. J. Beau), 1939. El la socikritika tendaro tradukis Léon Bergiers novelon de Jean Tousseul *Morto de Blanjo* (1926), kaj en 1927 du novelojn de Eekhoud: *Servokapabla* kaj *Marcus Tybout.* La romano de M. Catalany *Klari* (tr. E. Robert) aperis en 1928. De Voltaire aperis *Kandid* (tr. Adam) 1929. A. de Musset reprezentiĝis per la verkoj (tr. J. v. Schoor): *La du Amatinoj* kaj *La Kapricoj de Mariano* en 1930, kaj *Mimi Pinson* (tr. Rethel), 1934. *Tri Rakontoj el Impresoj de Vojaĝo* de A. Dumas tradukis Deligny (1932). La faman komedion *Knock* de Jules Romains tradukis Corret (1932), kaj la modernan satirfabelon de André Maurois *Bareluloj kaj Fadenuloj* tradukis Fabo (1933). Inter la unuaj libroformaj tradukaĵoj de G. Waringhien estis *Pripensoj aŭ Sentencoj Primoraj* de La Rochefoucauld, 1935. Du novelkolektoj de G. Duhamel aperis: *Rakontoj pri Nederlando* (1938) kaj *Norda Kanto* (1939), ambaŭ tradukitaj de R. Dupuis.

1940-1971: Post la Dua Mondmilito la elfranca tradukarto reviviĝis kvalite altega. En 1949 aperis *Fabloj* de La Fontaine, verse tradukitaj de L. Thèvenin. Samjare aperis la elfrancigo de *Leteroj el*

Mia Muelejo, de A. Daudet (tr. Mijake ŝihej). De la sama aŭtoro aperis la romano *Tartarin de Taraskono* (tr. Delor kaj Lebrun), 1955. Guy de Maupassant estas reprezentata per *Normandaj Rakontoj* (tr. R. Dupuis), 1953. De Voltaire aperis 3 verkoj: *Zadig, Kandid* kaj *Senartifikulo* (tr. E. Adam), 1957. Teamo konsistanta el G. Waringhien, K. Kalocsay, R. Bernard, M. Carlsson, L. Tárkony kaj H. Vatré tradukis la tutan *Floroj de l'Malbono* de Baudelaire, 1957. Ankaŭ de Baudelaire aperis *La Spleno de Parizo* (tr. P. Lobut), 1967. Komedio de Molière *La Mokindaj Preciozulinoj* (tr. Ribot) eldoniĝis en 1957. De A. de Saint-Exupéry aperis *La Eta Princo* (tr. A. Delaire), 1960. De Marcel Pagnol la komedio *Topaze* kaj de Ch. Vildrac la komedio *La Ŝipego Tenacity* aperis en 1960 en traduko de R. Bernard. La romano de J. P. Sartre *La Naŭzo* (tr. R. Bernard) aperis en 1963. De la sama aŭtoro aperis ankaŭ *La Respektema P . . .* kaj *Sen Eliro,* ambaŭ en 1964, en traduko de R. Bernard. La sama tradukinto eldonis la antologieton *Apenaŭ Bukedeto . . .* (1971).

El la literaturscienca vidpunkto estas interesaj la verkoj de A. da Silva *Vivo de Zola* (tr. Manuel de Freitas), 1946, kaj la tezo de Colette Llech-Walter *Ekzistencialistaj Herooj en la Literatura Verkaro de J. P. Sartre,* 1959.

7.2.15 El la Frisa Literaturo

El la frisa literaturo aperis libroformaj literaturaĵoj nur en la lastaj jaroj. *Frisaj Rakontoj,* kun 20 prozaĵoj, aperis en traduko de grupo da tradukistoj, en la redakto de S. S. de Jong en 1964, kaj la novelaro de P. Wybenga, *Dorse kontraŭ la Muro* (tr. S. Stuit), pri la nazia okupado de Frisio, aperis en 1966.

7.2.16 El la Germanlingva Literaturo

1887-1918: Inter la unuaj verkoj esperantlingve aperintaj estas la komedio de J. W. Goethe *La Gefratoj* (tr. A. Grabowski), 1889 (2-a eld. 1909; represita en 1967). De Goethe, krome, aperis la tragedio *Ifigenio en Taŭrido,* en la majstra traduko de L. L. Zamenhof, 1908 (3-a eld. 1929), la poezia romano *Hermano kaj Doroteo* (tr. Küster), 1911 (2-a eld. 1922), kaj *La Suferoj de Juna Werther* (tr. P. Usinger), 1911 (nekompleta libroforma eldono).

Ankaŭ el H. Heine oni multe tradukis: aperis *Pentraĵoj el Vojaĝo* (tr. Vl. Gernet kaj A. Kofman), 1897, *Libro de Kantoj* (tr. L. L. Zamenhof, Leo Belmont, k.a.), 1911 (2-a eld. 1912), *Elektitaj Poemoj* (tr. Pillath; ps. Zanoni), 1914 (2-a eld. 1920).

De Bölsche aperis unu ĉapitro el *La Ama Vivo en la Naturo* (tr. L. E. Meier), 1906. Abundas ankaŭ tradukaĵoj el Schiller: aperis la poezia dramo *Wilhelm Tell* (tr. L. E. Meier), 1906, la triakta komedio *La Nevo kiel Onklo* (tr. Stewart), 1907, la dramo *La Rabistoj* (tr. L. L. Zamenhof), 1908. Fine, aperis *Poeziaĵoj* (tr. F. Zwach), 1913 (2-a eld. 1928).

Elektitajn Fabelojn el la kolekto de la fratoj Grimm tradukis Bein (1906). La rakonto de Grillparzer *La Monaĥejo ĉe Sendomir* (tr. L. E. Meier) aperis en 1907. De P. Heyse aperis novelo, *Edziĝa Festo en Capri* (tr. L. E. Meier), 1907. Samjare aperis verketo de E. T. A. Hoffmann, *Sabla Homo* (tr. H. Hodler). En 1909 aperis tradukaĵo el L. Tieck: *La Blonda Ekkberto* (tr. W. Fischer), 2-a eld. 1911. La dramo de Th. Körner *Toni* (tr. F. Stephan) aperis en 1909, dum la burĝa komedio de Lessing *Minna de Barnhelm* (tr. A. Reinking) aperis postan jaron (1910). De W. Hauff estas publikigita novelo *La Karavano* (tr. Eggleton), 1910 (2-a eld. 1921) kaj rakonto *Fantaziaĵoj* (tr. G. Hillebrecht), 1912. De Schnitzler aperis en 1912 la unuakta groteskaĵo *La Verda Kakatuo* (tr. Schroder). Friedrich Hebbel reprezentiĝis per du gravaj verkoj: la 5-akta tragedio *Judith* (tr. Lederer), 1912, kaj la 5-akta tragedio *Gyges kaj Lia Ringo* (tr. Bennemann), 1916. La novelo de W. Raabe *La Nigra Galero* (tr. F. Wicke) aperis en 1912 (2-a eld. 1922). La kontraŭmilita romano de Bertha von Suttner, *For la Batalilojn!* (tr. A. Caumont) aperis ĝuste en 1914. Fine, en 1918, aperis la *Vintro-Fabeloj* de H. Seidel (tr. Bücker).

En ĉi tiu periodo L. E. Meier kunmetis la verketon *Kvin Noveloj* (de Grillparzer, Th. Körner, Seidl), 1912. Aperis krome *Nordgermanaj Rakontoj* de Bandlow (tr. Scheerpeltz), 1912 (2-a 1924). *Svisaj Rakontoj* de E. Zahn aperis en 1913 (tr. Ch. Pulvers). De ĉi tiu verkisto aperis ankaŭ la novelo *La Patrino* (tr. J. Schmid), 1913 (2-a eld. 1923). *Noveletoj el la Nigra Arbaro* kompilis H. Christaller, 1913 (2-a eld. 1923), dum *Elzasaj Legendoj* tradukis Ch. Pulvers, 1914 (2-a eld. 1924).

Aperis ankaŭ kelkaj kantolibroj. La plej interesa estas *Germanaj Popolkantoj*, 1912 (2-a eld. 1913), kiun kunmetis kaj tradukis teamo.

1919-1939: Post la Unua Mondmilito la eldona agado en Germanio daŭris nur ĝis 1933, en Aŭstrio ĝis 1938.

Jam en 1921 aperis *Fabloj* de Lessing (tr. L. E. Meier); de la sama aŭtoro la dramo *Natan la Saĝulo* (tr. K. Minor) venis en 1923. En 1921 aperis *La Struvelpetro*, de H. Hoffmann (tr. J. Applebaum; reeldonita en 1971). Samjare aperis novelo de W. Hauff, *La Kantistino* (tr. E. Wüster). Alia novelo de Hauff aperis en 1923: *La Almozulino de la Pont des Arts* (tr. Brüggemann).

De J. W. Goethe aperis la plena versa traduko de la unua parto de *Faŭsto* (tr. Barthelmess), 1923, (2-a eld. 1949); krome, *Romaj Elegioj* kaj *La Taglibro,* 1932, en tre taŭga traduko de K. Kalocsay. Novelo de Zschokke aperis en 1923 (tr. Brüggemann). De H. Heine estis publikigitaj *La Rabeno de Baĥarah* (tr. L. L. Zamenhof), 1924, *Atta Troll* (tr. F. Pillath), 1925, kaj *Elektitaj Prozaĵoj* (tr. F. Pillath), 1928. La 5-akta tragedio de Hebbel *Maria Magdalena* (tr. Bischitzky) aperis en 1922, dum la rakonto de A. de Chamisso, *La Mirinda Historio de Petro Schlemihl* (tr. E. Wüster), estis publikigita samjare. En 1927 aperis la traduko el la tradicia *Vojaĝoj kaj Mirigaj Aventuroj de Barono de Münchhausen* (tr. J. D. Applebaum). Samjare aperis *Vienaj Legendoj,* kolektitaj de A. Mair.

La socikritika verko de Ernst Toller *La Hirundlibro* (tr. H. Wolff) estis eldonita en 1929. Aperis du ĉefverkoj de Erich Maria Remarque: *En Okcidento Nenio Nova* (tr. J. F. Berger), 1929, kaj *La Vojo Returne* (tr. Berger), 1931. Kelkaj noveloj de Th. Storm aperis: tr. H. Heitmüller (1929), kaj tr. Bader (1934). De W. Kloepffer aperis *Vagabondo kaj Sinjorino* (tr. Goppel), 1931. De Rainer Maria Rilke aperis *Leteroj al Juna Poeto* (tr. A. Münz), 1934. En 1937 aperis la verko de J. Nestroy *Antaŭaj Cirkonstancoj* (tr. H. Steiner) kaj en 1932 novelo de Stefan Zweig *La Okuloj de la Eterna Frato* (tr. H. Wolff).

En 1931 aperis dudek elgermanigitaj poemoj en la verko de K. Kalocsay *Eterna Bukedo. Germanajn Kantojn* aperigis traduke F. Pillath en 1921 (2-a eld. 1922). En 1939 venis *Svisa Antologio* (red. A. Baur) kun literaturhistoria enkonduko kaj valora kolekto de tradukoj el verkoj de svisaj germanlingvaj (alemanaj) verkistoj.

1940-1971: Post la Dua Mondmilito aperis pluraj verkoj, tamen la eldonado ne plu estis tiel vigla, parte pro la profundaj frapoj, kiujn la Esperanto-Movado suferis dum la nazia regado kaj pro la milito.

Jam en 1947 aperis libro kun noveloj de Kleist, Stifter kaj Th. Storm, tradukitaj de Pebe (ĉu Bennemann?). Samjare, A. Bader aperigis 2 novelojn de Storm kaj de M. Escherich, kaj aperis romano de la svisa verkisto J. C. Heer, *Ĉe la Sanktaj Akvoj* (tr. A. Bader). Novelkolekto el la verkoj de Stefan Zweig *(Brulanta Sekreto,* tr. K. kaj P. Schwerin) aperis en 1949. L. Goppel tradukis la novelon de R. C. Muschler *La Nekonatino* (1951). La verko de K. L. Immermann, *La Karnavalo kaj la Somnambulino* (tr. A. E. Wohlthat) aperis en 1952. Kelkajn jarojn poste (1957) aperis verko de Eichendorff *El la Vivo de Netaŭgulo* (tr. Bennemann). Lasta evento, 1969, estas *Kantoj kaj Romancoj,* de Heinrich Heine, en la genia traduko de K. Kalocsay kaj G. Waringhien.

Ĝis nun ne aperis germana antologio, kvankam partoj el ĝi pretas, kaj estis publikigitaj en *Okcidentgermana Revuo*. En 1953 aperis tamen *Aŭstria Antologio*, kaj multnombraj verkoj troveblas en multege da Esperantaj revuoj ekde *La Esperantisto*.

7.2.17 El la Hebrea Literaturo

La plej fama hebrea verko, *La Malnova Testamento*, aperis en 1926, parte el la hebrea, parte el la aramea lingvoj. Ĝin tradukis, kaj parte jam antaŭmilite aperigis, L. L. Zamenhof. La definitivan redakton kaj korekton pretigis grupo de anglikanaj pastoroj. La unua provo traduki el la Biblio estis farita de E. Neumark: *Libro de Ruth*, 1893. El la Miŝnao tradukis J. Rabinovic la libron *Patroj* 1930. De Naum Jerusalmi aperis *Eksiĝo* kaj *Merkado la Azenpelisto* (tr. Levi Wiener), 1933. Modernan romanon tradukis Ota Ginz: *Freŝa Mateno*, de Reuven Kritz, 1967.

En 1941, en Palestino, aperis *Kantaro Hebrea*, pretigita de J. J. Kohen-Cedek.

7.2.18 El la Hindaj Literaturoj

La ĉefa tradukisto, kiu verkis ankaŭ originale, estas la Bengalo Lakshmiswar Sinha. Li rekreis traduke la dramrakonton *Sivaĝi*, sur la historia fono de la hinda 17-a jarcento (1929). En 1930 aperis lia *Tri Bengalaj Fabeloj*, kaj en 1961 la novelkolekto de Rabindranath Thakur (Tagore) *Malsata Ŝtono*.

Krome, jam en 1912 tradukis elsanskrite Antoni Lange verketon *Nalo kaj Damayanti*. Rakontforme aperis *Sakuntala*, la fama dramo de Kalidasa, 1927, kaj pluraj klasikaĵoj, ĉefe religiaj: *Samanta-Mukha-Parivarto* (tr. Nohara kiuiĉi), 1933), la sepa ĉapitro de *Saddharmapundarika-Sutro* (tr. Nohara), 1936, la grava *Bhagavad Gîtâ* (tr. F. V. Lorenz), 1942, kaj la Sutroj unua ĝis dektria el *Digha Nikajo* (tr. H. Yoxon), 1949. En 1972 aperis *Rakontoj el Pançatantra* (tr. C. H. Dharmatilake).


7.2.19 El la Hispanlingva Literaturo

Hispanaj aŭtoroj 1887-1918: En ĉi tiu periodo hispanlingvaj tradukaĵoj aperis ĉefe dank' al la aktivo de kelkaj aparte kleraj pioniroj, kiel Vicente Inglada-Ors, kiuj ĉefe interesiĝis pri la teatro. De la granda Jacinto Benavente (1866-1954) aperis la jenaj teatraĵoj,

ĉiuj tradukitaj de V. Inglada: *La Manĝaĵo de la Sovaĝbestoj* (1907), *Kruela Adiaŭo* (1907), *La Angora Katino* (1907), *La Triumfanta Animo* (1907), *La Malbonfarantoj de la Bono* (1907), *Princino Bebe* (1907), *La Maleleganteco* (1906), *La Nesia Hejmo* (1909), *Perlabori Sian Vivon* (1909), *Hispanaj Dramoj* (1910), *Sabata Vespero* (1910), *La Domo de la Feliĉo* (1910), *Pli Forta ol Amo* (1910), *La Servanto de Don Juan* (1913), *La Paperujo* (1913), *La Gefavoratoj* (1914). Krome: *La Unuhora Revfeliĉo* (tr. Novejarque kaj Benet), dialogo, 1914. Samepoke aperis ankaŭ la kvarakta komedio de S. kaj J. Alvárez-Quintero (tr. V. Inglada) *La Galeotoj*. De Vicente Blasco-Ibáñez (1867-1928) aperis en 1894 la verketo *La Barako* (tr. Rafael Duyós). Al la sama tradukisto ni dankas *Inter Oranĝarboj* de Blasco-Ibáñez, 1900. *La Kuracisto per Batoj* kaj la triakta komedio *La Jeso de Knabinoj* de Leandro Moratín (1760-1828) estis tradukitaj de Vicente Inglada resp. Norman Maclean, 1906 kaj 1907. De Fray Luis de León, religitendenca verkisto de la 16-a jarcento, aperis la etika verko *La Perfekta Edzino* (tr. A. Jiménez-Loira), 1909. Fine, Vicente Inglada tradukis du verketojn de Ramón de Campoamor (1817-1901): en 1911 kaj 1918.

Hispanaj aŭtoroj 1918-1938: La traduka aktivo daŭris senhalte ĝis la civila milito. De Cervantes-Saavedra (1547-1616) aperis pluraj ĉapitroj, tamen neniam la tuta *Don Kiĥoto:* la unuan provon (3 ĉapitrojn) faris Bourlet, Inglada kaj Law en 1905. La duan Fr. Pujulà-i-Vallès en 1909 (2-a eld. 1924): 5 ĉapitrojn; la trian Julio Mangada-Rosenörn en 1927. La lastan faris Luis Hernández en 1955. Ankoraŭ de Cervantes aperis la traduko (pretigita de Mangada) de du bonekzemplaj noveloj: *Du Junaj Fraŭlinoj* kaj *Korneliino*, 1927. De Pedro Calderón-de-la-Barca (1600-1681) aperis *La Urbestro de Zalamea* (tr. Enrique Legrand), 1925. Antologian karakteron havas la verko *El Moderna Hispana Parnaso* (tr. Julio Mangada-Rosenörn), 1927. La fikcia romano de Coronel Ignotus (ps. de José de Elola), *La Amo en la Jaro Dekmil* (tr. J. F. Berenguer), aperis en 1932. La pulĉinela komedio de J. Benavente *La Kreitaj Profitoj* (tr. V. Inglada) aperis en 1932. En 1935 aperis alia verko de Vicente Blasco-Ibáñez: la romano *Sango kaj Sablo* (tr. R. de Salas-Bonal). Fine, en 1937, aperis la rakonto *La Ĵusnaskito* de Ricardo Becerro-de-Bengoa (tr. J. F. Berenguer).


Hispanaj aŭtoroj 1929-1971: La revigliĝo de la Esperanta Movado post la civila milito postulis iom da tempo. Do nur en 1952 aperis la *Spiritaj Ekzercadoj* de Ignacio de Loyola (1491-1550) (tr. E. Maynar). En 1964 Alvaro de Orriols tradukis *La Amo de Don Perlimplin,* de Federico García-Lorca. Oni ĝin sukcese recitis, sed neniam aperigis libroforme. En 1965 aperis la traduko, de Diego



La Tragedio de l' Homo estis nur la unua inter la tradukaj ĉefverkoj de Kalocsay, kies kontribuo al la traduka beletro estas ankoraŭ pli grandioza ol lia kontribuo al la originala literaturo en Esperanto.



L.Somlai (antaŭ la Dua Mondmilito: L.Spierer) apartenis al la plej aktivaj tradukistoj en la ora epoko de la Budapeŝta Skolo.



Kvankam la unuaj provoj traduki el *La Biblio* okazis jam en 1893 (E.Neumark: *Libro de Ruth*) kaj ankaŭ D-ro Zamenhof tradukis el *La Malnova Testamento*, la kompleta verko aperis nur en la jaro 1926.

Selso, de la verko *La Buĉejo,* de Stefano Echeverría. Epokfara verko estas la traduko, pretigita de la Ruso K. Gusev, de la ĉefaj poeziaj verkoj de Federico García-Lorca (1898-1936): *Liriko,* 1968, el *Romancero Gitano, El Poema del Cante Jondo,* k.a. De José Maria Escrivá-de-Balaguer (1902-) aperis en 1968 la verko *Vojo* (tr. Nicolás López-Escartín). Samjare aperis funebr-humura verko de Wenceslao Fernández-Flórez (1886-1964), *Filozofio de Fantomo* (tr. L. Hernández). Fine, en 1969, aperis la fama rapsodia poemo de Antonio Machado (1875-1939), *La Lando de Alvargonzález,* tradukita kun granda enhava kaj ritma fideleco de F. de Diego.

Dank' al la tradukemo de F. de Diego aperis en 1971 rimarkinda verko de Federico García-Lorca: la tuta *Cigana Romancaro.*

Multaj verkoj aperis traduke ankaŭ en pluraj revuoj: i.a. verkoj de José Zorrilla, Pedro Antonio Alarcón, Rubén Darío, Marqués de Santillana, k.a. Tradukis ĉefe Amalia Núñez-Dubús, Fernando Redondo, Julio Mangada-Rosenörn, k.a.

Interesa estas la verketo *Pri Cervantes kaj Lia Famkonata Verko „El Quijote",* 1915, kaj la verko de J. Mangada *Pri Hispanujo kaj Ĝiaj Popolkantoj* (Popolkantaro de Murcia), 1926.

Latinamerikaj aŭtoroj: De la meksika verkisto Amado Nervo (1870-1919) aperis dulingve *Kvin Poemoj el Pleno,* 1941. De la urugvaja verkisto José Enrique Rodó (1871-1917) aperis la filozofia rakonto *Ariel* (tr. M. Fernández-Menéndez), 1950. La popolan eposon argentinan *Martín Fierro,* de José Hernández prezentis en mirinda traduko Ernesto Sonnenfeld en 1965.

Multon tradukis lastatempe la argentina poeto Diego Selso (pseŭdonimo de Adán Hrynkiewicz): *Mozaiko de Lumo kaj Ombro* de M. E. Brisigelo, 1966; *Alvoko de l'Silento* de Leandra Recareo, 1966, kaj *En la Flamoj Voluptaj de l'Amo,* propra poemaro, 1966.

D. Selso aperigis ankaŭ *Kanzonojn:* 1965, en du volumoj.

7.2.20 El la Hungara Literaturo

1887-1920: Unua antologiforma verko estas la ne tre granda, stile nematura, tamen interese ambicia verko duvoluma, *Hungara Poemaro* (tr. Fiedler, Marich, Altenburger kaj Rajczy), 1908, kun poemoj de Arany, Szabolcska, Berzsenyi, Petöfi kaj kun kantaro.

En 1906 aperis la verko de A. Abonyi, *Mallumaĵoj* (tr. P. de Lengyel), 2-a eld. 1907. *Du Noveloj* de Maŭro Jókai (tr. Luczenbacher) aperis en 1911. *Elektitaj Poemoj* de A. Petöfi (tr. Fuchs) aperis en 1911 (2-a eld. 1923). La rakonto de Mikszáth *Fantomo en Lubló* (tr. E. Forster) venis en 1912. Aperis krome du verkoj de Herczeg: *Hungaraj Rakontoj* (tr. Panajott), 1912, 2-a eld. 1923, kaj *Marĉfloro* (tr. A. Göltl), 1913.

1921-1939: Tuj post la Unua Mondmilito estiĝis en Hungario literatura florado. La unuan antologian verkon pretigis Fr. Szilágyi *(Poemaro el Hungarlando),* 1929, kiun sekvis unu el la plej gravaj antologiaj verkoj iam aperintaj: *Hungara Antologio,* 1933, kies ĉefredaktoro estis Kalocsay, kun la kunlaboro de Baghy, Szilágyi, Bodó, Halka kaj Tárkony.

En 1922 aperis du noveloj de Géza Gárdonyi: *Du Kokcineloj* kaj *La Montro* (tr. K. Kalocsay). Samjare aperis la komedio de Heltai kaj Makai *La Paĝio de la Reĝino* (tr. K. Kalocsay). La postan jaron, 1923, aperis la poezia verko de A. Petöfi *Johano la Brava* (tr. Kalocsay). Samjare venis la triakta dramo de Fr. Karinthy (1888-1938, mem esperantisto) *Morgaŭ Matene* (tr. Kalocsay). En 1924 aperis la drampoema ĉefverko de Imre Madách *La Tragedio de l' Homo* (tr. K. Kalocsay), 2-a eld. rev. 1965, kaj 1926 alportis novelkolekton de Karinthy, *Norda Vento* (tr. K. Bodó). La romano de Babits *La Cikoni-Kalifo* aperis en 1929, en brilstila traduko de K. Bodó. L. Tárkony tradukis la rakonton de Fr. Karinthy *Vojaĝo en Faremidon* (1934). En 1937 aperis la romano de Jolanta Földes *La Strato de Fiŝanta Kato* (tr. Halka kaj Spierer). La fama romano de Ferenc Molnár *La Knaboj de Paŭlo-Strato* (tr. L. Spierer) aperis en 1937. Samepoke L. Spierer [1] tradukis la novelon de A. Petöfi *La Avo.* En 1938 aperis la novelo *Rozinjo* de Gyula Török (tr. K. Kalocsay). Socikritika romano de L. Kassák, *La Vojoj Estas Nekonataj,* estis eldonita en 1940 (tr. L. Spierer).

1940-1971: Pro la politika situacio, dummilite kaj de 1950 ĝis 1956, nenio povis aperi en Hungario mem. Tiel, 1943, aperis en Anglio la sprita romano de K. Aszlányi *Sep Vangofrapoj* (tr. L. Spierer). La romano pri la dekadenco de la hungaraj nobela kaj burĝa klasoj *Printempo de Morto* de Lajos Zilahy (tr. L. Somlai) aperis en 1947. Nur en 1957 povis aperi la romano pri malriĉaj kamparanoj *Amara Pano* de J. Darvas (tr. L. Somlai). La romaneto *Vuk* de István Fekete (tr. M. Leszkó) aperis en 1966. Samjare oni publikigis la raportromanon de la moderna verkisto Ferenc Sánta *Dudek Horoj* (tr. de grupo). En la traduko de K. Kalocsay aperis en 1970 la elektita poemaro de Sándor Petöfi *Libero kaj Amo.*

Multaj literaturaĵoj aperis ne libroforme, sed en revuoj: *Literatura Mondo, Norda Prismo, La Suda Stelo, Monda Kulturo, Belarto, Hungara Vivo,* k.a. Multaj poemoj aperis krome en *Eterna Bukedo* (tr. Kalocsay), 1931.

Ankaŭ la kantaroj estas bone reprezentataj: Kalocsay kolektis kaj tradukis *Kantanta Kamparo* (101 tekstojn), 1923, kaj *Gemoj de la*

1. L. Spierer (1906-71) post la milito alinomiĝis L. Somlai.

Hungara Popolmuziko, 1929. Aperis krome kolekto el popolkantoj kaj laboristaj kantoj: *Ni Kantu!* (108 hungaraj tekstoj), 1928.

Valora estas la bibliografia verko de S. Tiborc, *Esperanto en Hungarlando,* 1959.

7.2.21 El la Indianaj Literaturoj

El la indiana kolekto *Legendoj de Vancouver,* de la princino Tekahionwake, aperis esperantlingve kelkaj paĝoj, tradukitaj, versâajne el la angla versio, de W. H. Fenton.

7.2.22 El la Indonezia Literaturo

En 1924 Liem Tjong Hie aperigis verketon: *Javaj Legendoj kaj Fabloj.* P. W. Broek publikigis en unu libro du javajn rakontojn: *Devi Angreni* kaj *Mak Miah* (1927).

7.2.23 El la Islanda Literaturo

El la islanda tradukis ĉefe Baldur Ragnarsson (konata ankaŭ kiel originala verkisto). Aperis la poemaro *Sub Stelo Rigida* de Thorsteinn frá Hamri, 1963, kaj poemkolekto *Islandaj Pravoĉoj,* 1964, kiu tre bone redonas esperantlingve la arkaan etoson de la originalaĵoj. Krome aperis tradukoj, ĉefe poeziaj, en *Voĉo de Islando* (1949-50 kaj 1959-60) kaj en *Norda Prismo* (1955 ĝis nun).

7.2.24 El la Itala Literaturo

La italingvaj beletristoj Esperantaj neniam estis tre aktivaj koncerne tradukadon. La konsekvenco estas, ke la itala literaturo ne estas sufiĉe reprezentata.

1887-1939: En 1906 aperis la unua libroforma tradukaĵo: la unuakta drameto de E. de Amicis *La Floro de l'Pasinto* (tr. Rosa Junck). En 1910 aperis el verko de Ippolito Nievo ĉapitro *La Idilio ĉe la Fonto* (tr. A. Tellini). En 1912 aperis la dramo de Giovanni Bovio *Kristo ĉe la Festo de Purim* (tr. Tellini), *La Urbo, kiu Dormas* (tr. Tellini), kaj la *Kompararo* de Giuseppe Giusti (tr. Tellini).

En 1920 aperis la *Pia Versaro* de S. Alfonso de Ligorio (tr. A. H. M. Kools). La postan jaron (1921) aperis la versa komedio de G. Giacosa *Ŝakludado* (tr. de la fratoj Padulli: la sama komedio estis jam aperinta en 1915 en traduko de Cl. Bicknell). Samjare aperis elektitaj ĉapitroj el la itala romano ĉefverka *La Gefianĉoj* de A. Man-


zoni: *La Pesto en Milano dum 1630* (tr. P. C. Monti). En 1922 aperis traduko de etika verko de G. Mazzini *La Devoj de la Homo* (tr. Arabeno) kaj *Italaj Rakontoj* (tr. P. C. Monti). 1923 alportis la dramon de Giovanni Verga *Kamparana Kavalireco* (Cavalleria rusticana, tr. R. Castagnino) kaj la prietikan verkon de Silvio Pellico *Pri la Devoj de l' Homoj* (tr. A. Tellini). En 1926 aperis *La Floretoj de St. Francisko* el mezepoko (tr. Fr. Pizzi), kaj 1930 la fama porinfana verko de Carlo Lorenzini (ps. Carlo Collodi) *Pinokjo* (tr. M. Marchesi). En 1931 aperis la *Historio de Kristo,* de Giovanni Papini (tr. E. Fasce). En 1933 venis vervoŝpruca komedio de Carlo Goldoni *Kurioza Okazaĵo* (tr. Mevo, ps. de R. Orengo). Ĉefverko aperis en 1933: la tuta *Infero* (unua parto de la *Dia Komedio)* de Dante Alighieri, tercine tradukita de K. Kalocsay. Temas pri entrepreno kolosa, kiu mirigas onin pro la kuraĝo — kaj pro la senprecedence bela sukceso. Estis cetere multaj, kiuj provis traduki Dante inter 1905 kaj 1956: E. Wüster, R. Bagnulo, A. Mazzolini, D. Rivoir, P. C. Monti, E. Dondi, A. Grabowski. En 1935 aperis verko de Mussolini: *Vivo de Arnaldo.* En 1936, en bona traduko de E. Fasce, venis la konata porjunula libro *Koro,* de E. de Amicis. Provoj aperigi partojn estis faritaj de A. Tellini (1912) kaj de R. Castagnino (1924). Fine, en 1939, aperis en Nederlando la socikritika romano de la kontraŭfaŝista rifuĝinto Ignazio Silone: *Fontamara.*

1940-1971: Post la Dua Mondmilito aperis bona traduko de poemkolekto el Giovanni Pascoli: *Poemoj* (tr. G. Azzi), 1952. Verko de Pirandello estis bele tradukita de Srdjan Flego kaj recitita de IAT, sed neniam publikigita *(La Homo kun la Flor' Enbuŝe).* En 1963 aperis luksa volumo kun maloftaj ilustraĵoj de Botticelli: *Dia Komedio,* de Dante Alighieri, dulingva volumo, tradukita de Giovanni Peterlongo, senrime, kaj reviziita de Conterno kaj Waringhien. En 1970 aperis lerta traduko de L. Minnaja: temas pri la poemo de Ugo Foscolo *Pri la Tomboj.* La sama tradukinto aperigis ankaŭ kelkajn poemojn de la minortona poetino moderna Lydia Senes: *Eta Bukedo,* 1970.

Alispecaj verkoj: Itala antologio ne aperis, kvankam oni periode ripetas ke „ĝi estas jam preta". Tamen en la *Svisa Antologio,* 1939, troviĝas bona elekto el svisaj itallingvaj (tiĉinaj) prozistoj kaj poetoj kaj literaturhistoria enkonduko.

Interesa estas la legolibro de Bruno kaj Elio Migliorini *Anekdotoj pri Dante* (1921).

Multaj literaturaĵoj aperis en antologioj internaciaj, kiel en *El Parnaso de Popoloj,* 1913, kaj *Postrikolto,* 1921 (tr. A. Grabowski) kaj en *Eterna Bukedo* (tr. Kalocsay), 1931. Multaj krome aperis en revuoj: i.a. en *Itala Esperanto-Revuo, L'Esperanto, Literatura Mon-*







Cezaro de M.Jelušić ne estas aparte grava verko, sed ĝia traduko de Ivo Rotkvić estis epokfara.

Post multaj provoj de fragmentaj tradukoj – inter kiuj ankaŭ tiu genia de Kalocsay (*Infero*, 1933) – *La Dia Komedio* aperis en 1963, en luksa dulingva volumo kun ravaj ilustraĵoj de Botticelli.

Miyamoto masao: Talentaj originalaĵoj kaj kompetentaj tradukoj el la japana.

do, Esperanto, Literatura Foiro (1970-). Tiamaniere aperis en Esperanto verkoj de Giovanni Boccaccio, Petrarca, Cecco Angiolieri, Dante Alighieri, Franco Sacchetti, S. Francisko, Lodovico Ariosto, Raffaello Sanzio, Michelangelo Buonarroti, Vittoria Colonna, Gaspara Stampa, Baldassar Castiglioni, Pietro Metastasio, Gaspare Gozzi, Gabriello Chiabrera, Torquato Tasso, Carlo Goldoni, Giuseppe Parini, Niccolò Tommaseo, Giacomo Leopardi, Alessandro Manzoni, Fogazzaro, G. Verga, Giacosa, Matilde Serao, A. Graf, Giosuè Carducci, D'Annunzio, Giovanni Pascoli, Ungaretti, k.a.

7.2.25 El la Japana Literaturo

1887-1920: Antaŭ la Unua Mondmilito, parte pro politikaj kaŭzoj, parte pro la malgrandeco de la japana Esperanta Movado, nur malmulto povis aperi. En Okcidento aperis *Japanaj Rakontoj* (tr. Ĉif toŝio), antologieto, 1910 (3-a eld. 1923).

1920-1941: Post la Mondmilito, la situacio de Esperanto pliboniĝis, kaj komencis aperi multe da verkoj, kiuj signas literaturan floradon ankoraŭ nun daŭrantan. En tiu epoko aperis du ĉefaj antologispecaj verkoj: la unua, aperinta en 1921, enhavis klasikajn poemojn ĉinajn kaj japanajn: *Perloj el la Oriento* (tr. Ossaka kenĵi). La dua estis *Verda Parnaso* (tr. Ito saburo), 1932. *Eterna Bukedo* (tr. Kalocsay), 1931, enhavis ankaŭ 44 eljapanigitajn poemojn.

En 1924 aperis la novelo de Arišima takeo *Deklaracio* (tr. Tooguu tojosato), en 1932 de la sama aŭtoro la moraltendenca rakonto *Senbedaŭre Amo Rabas* (tr. Tooguu). Ankaŭ en 1924 aperis teatraĵo de Huĝii mazumi *Nova Satano* (tr. Sakrada iĉiro). De Kikuĉi kan aperis dramo *La Patro Revenas* (tr. Kaĵi hirokazu), 1927, kaj alia verko *Amo de Tooĵuuroo* (kun du aliaj teatraĵoj), 1934 (tr. Ŝimomura joŝiŝi). Tri teatraĵojn de Akita uĵaku, *Fonto de Sudroj, Danco de Skeletoj* kaj *Nokto ĉe Landlimo,* kunigis libreto tradukita de Ŝuzui haĵime kaj Susuki kaname, 1924. En 1927 sekvis teatraĵo de Kaneko joobun *Lavisto kaj Poeto* (tr. Tooguu). La postan jaron, 1928, aperis la verko de Nacume sooseki *La Turo de Londono* (tr. Nishi seiho), 3-a eld. 1960. De Edogaŭa rampo aperis *Ruĝa Ĉambro* (tr. Kaĵi) en 1928 kaj *Ora Masko* (tr. Ŝimomura) en 1931. La teatraĵo de Jamamoto juzo *Infanmurdo* (tr. Ŝimomura) aperis en 1930. Klasikan drameton *Gracia,* de Fuĵisaŭa kosecu, tradukis Hata masajo kaj Murakami tomojuki (1930). Kortuŝa rakonto pri karceruloj estis aperigita traduke de grupo (sub gvido de Hattori tôru) en 1937: *Karcero,* de Simaki kensaku. Al Nohara kiuiĉi, merita literatura pioniro, ni dankas tradukojn de du gravaj mitologi-historiaj verkoj: *Kroniko Japana,* kvinvoluma traduko de *Nihonŝoki* (720 p.K.), 1935-39; kaj

Zinnoo Sjootoo Ki, historio de la japana imperiestra trono verkita de Kitabatake ĉikafusa (1339), 1941.

1942-1971: La Dua Mondmilito lasis en Japanio multe da ruinoj, sed post ĝi la situacio por Esperanto fariĝis pli favora. Du gravaj antologi-specaj verkoj aperis: la unua, en 1956, estis tradukita de Ossaka kenĵi, *El Orienta Florbedo* (kun poemoj); la dua, en 1965, estas *El Japana Literaturo 1868-1945.*

En 1954 aperis *La Kapao* (kaj aliaj rakontoj) de Akutagawa ryûnosuke (tr. Nozima yasutarô). En 1958 Ossaka aperigis tradukon de *505 Elektitaj Poemoj el Mannjoo-Ŝuu,* la klasika japana poemkolekto (8-a jc. p.K.). La filmscenario *Mil Papergruoj* de Moroi zyôzi (tr. Tanaka sadami) aperis en 1959. Sub la ĉefredakto de Nakamura tazuo aperis (kvar) *Rakontoj de Oogai* (Mori oogai), 1962. *La Obstino,* rakonto de Nakazima atusi, estis tradukita de Miyamoto masao, 1963. Kolektivo de KLEG, sub la gvido de Miyamoto, kompiltradukis la libron *Japanaj Malnovaj Rakontoj* (1965). Samjare aperis ekstraktoj el verkoj de Deguĉi nao, onisaburo, sumiko, hidemaru kaj naohi: *Kvinteto* (tr. Nakamura). De Ihara saikaku, verkisto vivinta dum la Tokugaŭa-epoko: 1642-93, aperis kolekto de kvin noveloj, *Kvin Virinoj de Amoro* (tr. Miyamoto), 1966. *El la Vivo de Syunkin* de Tanizaki zyun'itirô (tr. Miyamoto masao kaj Isiguro teruhiko), kun 2 teatraĵoj kaj 2 noveloj, aperis en 1968. Modernajn hajkojn tradukis la hajkista grupo en Oosaka: *Etudo '68.* Rakonto *Kristo el Bronzo* de Nagayo yosio (tr. Ueyama masao) aperis en 1970. En 1971 aperis *Neĝa Lando,* verko de la nobel-premiito Kawabata yasunari (tr. Konisi gaku). Samjare Miyamoto pretigis tradukantologion *El Manjoo.*

Kompreneble la tradukaĵoj el la japana aperis ne nur libroforme. Ili aperis ankaŭ en revuoj, kiel en *La Revuo Orienta, Oomoto, Literatura Mondo, Prometeo, Kajero, L'Omnibuso,* kaj aliloke.

Aperis pluraj kantaroj: el la plej modernaj elstaras *Japana Kantaro,* 1957, pretigita de Isobe syôsaku, *60 Tradiciaj Japanaj Kantoj,* en redakto kaj traduko de Matuba kikunobu, 1967, *Kien Floroj?* (modernaj popolkantoj) de Konisi gaku, 1967, kaj *Venu Amikoj,* parte originala, de Konisi gaku, 1970. En la periodaĵo *La Movado* ĉiunumere aperas nova kaj malnova japanaj kantoj.

En 1952 aperis la originala verko de Hasegaŭa teru *Historieto de la Japana Literaturo.* Alia originala verko aperis en 1964: *Enciklopedieto Japana* de Nakamura tazuo, majstra enkonduko en la japanajn vivmorojn kaj kulturon. Citindas ankaŭ *El Japana Literaturo (1868-1945),* red. Miyamoto masao kaj Isiguro teruhiko, 1965. Bibliografioj de japana literaturo en Esperanto aperis en 1956 kaj en 1970.

7.2.26 El la Jida (Judgermana) Literaturo

Aperis pluraj verkoj de Ŝalom-Aleĥem: *Hebreaj Rakontoj* (tr. Muĉnik), 1923, *La Gimnazio* (tr. L. L. Zamenhof), 1924, la monologo *Ĉe Doktoro,* 1931, *Al Ĉiuj Egale (Mia Utopio)* (tr. M. Salzmann), 1948. Jam en 1912 estis provo traduki el Ŝalom-Aleĥem: la monologo *La Poto* (tr. S. Binder). De aliaj verkistoj aperis ankaŭ tradukaĵoj. Ni rimarkas la dramon de S. Rappoport *Dibuk* (tr. Lejzerowicz), 1927, kaj la kontraŭrasisman teatraĵon de Lejb Malaĥ *Misisipi* (tr. I. Jurysta), 1939. I. Lejzerowicz tradukis la historifonan rakonton de Ŝalom Asch *La Sorĉistino el Kastilio,* 1933.

El la jida kaj el la hebrea aperis novelaro: *Hebreaj Rakontoj* (tr. D. J. Rabinovic-Tajc), antaŭ la Dua Mondmilito, kun verkoj de J. L. Perec, A. G. Frug.

7.2.27 El la Jugoslaviaj Literaturoj

1887-1920: Antaŭ la Unua Mondmilito ne aperis multaj verkoj libroformaj. En 1911 estis publikigita la interesa romano de August Šenoa *La Trezoro de l'Oraĵisto* (tr. Fran Kolar-Krom). En 1912 aperis antologi-karaktera verko, redaktita kaj tradukita de Mavro Špicer: *Kroataj Poeziaĵoj.* La postan jaron, 1913, oni publikigis la verketon de Milka Pogačić *Konfeso* (tr. A. Jozić).

1921-1939: La intermilita epoko estis, kontraŭe, multe pli fruktodona. En 1924 aperis la teatraĵo de Milan Ogrizović, *Aŭtuna Vespero,* elkroatigita de Ivo Rotkvić. En 1926 venis rakonto de Dinko Šimunović *Ano de l'Ringludo* (tr. Fran Janjić). En 1933 aperis unu el la plej gravaj kroataj verkoj, la nacia eposo de Ivan Mažuranić (tr. Mavro Špicer) *La Morto de Smail-Aga Čengijić.* Novelo de Ivan Cankar aperis en poezia prilaboro pretigita de J. Stefančić: *La Servulo Jernej kaj Lia Rajto,* 1933. Tradukĉefverko estas la romaneca biografio de Mirko Jelušić, *Cezaro,* elkroatigita en fajrošprucan Esperanton fare de Ivo Rotkvić, 1934. La verketo de Ferdo Delak, laŭ la samnoma rakonto de la fama slovena verkisto Cankar, *Servisto Jernej kaj Lia Rajto,* aperis en traduko de F. Modrijan en 1936. La poemaro de Dragutin Tadijanović *Kanto al Mia Koro,* 1936, aperis en kompetenta traduko de J. Velebit.

1940-1971: La jugoslavia Movado rapide reorganiziĝis post la milito. Tion demonstras la nivelo, kiun kvalite la tradukaĵoj atingis. En 1954 aperis la elslovenigita verketo de Fran Levstik *Martin Krpan* (tr. J. Kozlevčar). Samjare Demetrović, Mamužić kaj Takač tradukis el la kroata *Elektitajn Poemojn* de Boro Pavlović. Kome-

dio de Br. Nušić, *Suspektinda Persono* (elserbigita de A. Sekelj) aperis en 1957. Aliaj verkoj de Nušić ekzistas en Esperanto: i.a. *Analfabeto* kaj *Butono*. En 1959 aperis *Tri Satiroj* de Domanović, Milčinski kaj Ćopić. J. Kozlevčar elslovenigis la rakonton de Venčeslav Winkler *La Ŝtelita Lampo* (1960). Samjare, ankaŭ elslovene, aperis la verketo de Erna Starovasnik *La Varma Rivereto*. El la kroata estis tradukita de B. Vančik la verko de Iv. Goran Kovačić *Kavo* (1960). La popularsciencan romanon de la junaj astronomoj-esperantistoj *Tragedio en la Universo* tradukis elkroate I. Rotkvić, 1961. La *Fabeloj* de F. Škrljac (tr. J. Velebit) estis publikigitaj en 1962. En 1965 kelkajn *Kantoj de l'Amo kaj de l' Patriotismo* tradukis B. Miličević. En 1972 du pliaj gravegaj verkoj en jugoslaviaj literaturoj estis publikigitaj en Esperanta traduko. Svetislav S. Petrovič tradukis la faman draman poemon de la Montenegrano Petro Petrovič Njegoŝ *La Montara Krono;* Josip Velebit redonis en altnivela poezia Esperanto la klasikan eposon de la kroata literaturo *La Morto de Smail-Agao Čengič* de la granda poeto Ivan Mažuranić.

Multaj aliaj tradukoj aperis en revuoj, ekz. en *La Suda Stelo, La Progreso, Monda Kulturo, Literatura Mondo, Internacia Kulturo, La Nica Literatura Revuo,* k.a. El la ĉefaj jugoslaviaj verkistoj, kies verkoj aperis ekskluzive enrevue, ni rimarkas Cesarić, Krleža, Domjanić, Dučić, Gundulić, Rakić, Andrić, k.a.

Grava estas *Bibliografio de Internacia Lingvo en Jugoslavio* de Marinko Gjivoje, 1954 kaj 1967. Li, krome, kompilis bibliografion de la beletraj tradukoj de jugoslaviaj verkistoj en la Esperanto-gazetaro (1964).

7.2.28 El la Kartvela Literaturo

Pluraj verkoj aperis en revuoj internaciaj aŭ en kelkaj efemeraj landaj organoj. Libroforme, la plejmulto aperis antaŭ la Unua Mondmilito: la rakonto de Ninoŝvili *Ordono* (tr. Tabukaŝvili), 1911, la verketo *Gogja Uiŝvili* (tr. Aĥvlediani), 1912. La verketo de Kazbek *Nino* (tr. Gogitidze) aperis en 1910.

7.2.29 El la Kataluna Literaturo

Antaŭ la Unua Mondmilito aperis libroforme pluraj verkoj de Santiago de Rossinyol: dramoj kiel *Folio de la Vivo* (1909), *La Patrino* (1908), *La Ĉiama Kantaĵo* (1910), *La Blua Korto* (1911), *Cikadoj kaj Formikoj* (1912), ĉiuj tradukitaj de Alfonso Sabadell; Vicente Inglada tradukis *La Griza Vilaĝo* (1911) kaj *Bonaj Personoj*. En

1909 aperis ankaŭ la triakta dramo de la teatra majstro Adrià Gual: *Mistero de Doloro* (tr. F. Pujulà-i-Vallès).

Post la Unua Mondmilito aperis du ĉefaj antologiformaj verkoj. Unu estis *Kataluna Antologio*, 1925, ĉefredaktata da Jaume Grau-Casas kun la helpo de aliaj 14 beletristoj. Ĝi dividiĝas en tri partojn (krom enkonduko): verkoj antikvaj, popolkantoj kaj moderna literaturo. Temas pri verko majstra, kun mejloŝtona signifo por la postaj tiaspecaj aperaĵoj. La alia verko estis la pli modesta *Hejma Prozo*, 1925 (tr. J. Bremón-Masgrau). En 1926 aperis grava verko de Prudenci Bertrana: *Barbaraj Prozaĵoj* (tr. Jaume Grau-Casas).

Post multjara interrompo, kaŭzita de la civila milito kaj de la malfavora situacio, aperis en 1967 la romano de Víctor Català (ps. de Caterina Albert-i-Paradis, 1869-1966) *Soleco*, en eleganta traduko de Josep Ventura-i-Freixas.

7.2.30 El la Keltaj Literaturoj

Aperis nur du lingvo- kaj literatursciencaj verketoj: la unua pri la bretona lingvo, verkita en 1929 de Roparz Hemon: *Esploro pri la Situacio de la Bretona Lingvo*, la alia pri la kornvala, aperigita originale en Esperanto de Geoffrey A. Sutton en 1969: *Konciza Historio pri la Kornvala Lingvo kaj Ĝia Literaturo.*

7.2.31 El la Kirgiza Literaturo

Aperis la popoltradicia verko *Kozu Kurpeĉ kaj Bajan Slu* (tr. K. Boguŝeviĉ), 1901.

7.2.32 El la Laosa Literaturo

Nur antaŭ kvino da jaroj ekaperis en Esperanto la unuaj laosaj literaturaĵoj, kiujn ĝenerale publikigas Neo Lao Haksat en Hanojo. Aperis ĝis nun tri novelkolektoj: *Indaj Gefiloj de Lao-popolo*, 1966, *Pluvas sur la Arbaron*, 1967, kaj *La Sovaĝa Kokino*, 1968.

7.2.33 El la Latina Literaturo

La unua kaj la dua kantoj de la *Eneido* de Virgilio (tr. Vallienne) aperis en 1904. En 1906 (2-a eld. 1910) aperis la tuta *Eneido*, heksametre tradukita, same de Vallienne. Temas pri verko impona, kvankam ĝi estas forme mallerte redonita kaj kun kelkaj makuloj, ĉefe koncerne la tradukon de latinaj esprimformoj. De Lucius Apu-

leius aperis *Amoro kaj Psiĥe* (tr. E. Pfeffer), el *Ora Azeno*, 1910 (2-a eld. 1924). De Marcus Tullius Cicero aperis *Sonĝo de Scipio* (tr. Hj. Runeberg), 1910. El la verkaro de la latinaj komediistoj oni publikigis nur *Rudens* de Plautus (tr. E. Noël), 1906.

Poemoj ellatinigitaj aperis en *Parnaso de Popoloj* (de Catullus, Horatius, Seneca), 1913, en *Eterna Bukedo* (9 poemoj), 1931, kaj dise en *Literatura Mondo, Hungara Vivo, Norda Prismo, La Nica Literatura Revuo*. Verŝajne la plej multajn tradukis K. Kalocsay. La verko de Giovanni Pascoli, Italo, kiu poetis ankaŭ latine, *Thallusa*, aperis en traduko de L. Minnaja en 1969.

7.2.34 El la Latva Literaturo

Novelo de J. Poruks, *Vakciniuja Krono* (tr. P. Kikau) aperis en 1909. Intermilite aperis literaturaĵoj ĉefe en *Literatura Mondo* kaj en la antologioj *Literatura Observo* kaj *Norda Literaturo*.

Libroforme, en la intermilita periodo aperis *Latvaj Kantoj* (tr. Ed. Jaunvalks), 1927.

Post la milito, ekde 1964 *Pola Esperantisto* aperigis kelkajn tradukaĵojn. Krome: *Norda Prismo, Paco* kaj *Monda Kulturo*.

Libroforme aperis la verko de la granda poeto Jānis Rainis *Amo Estas pli Forta ol Morto* (tr. Ints Čače), 1933. Postmilite aperis la verko *Jānis Rainis, Latva Popola Poeto*, 1965, kaj *Latva Poezio 1945-1966* (tr. Elvira Lippe kaj Milda Jakubcova), 1968, kun reprezentaj verkoj de 22 nuntempaj latvaj poetoj.

7.2.35 El la Litova Literaturo

En 1923 aperis *Litova Almanako*, pretigita de Dambrauskas, Klimas, Tijunaitis, Mačernis, Blažys, Bartoševičius, Šaulys kaj Koch. Iom pli poste, en 1938, aperis antologieto *El Litova Poezio* (tr. P. Lăpiene). Samjare aperis la verskolekto *Violetoj*, de B. Giedra, kun, krom originalaĵoj, ankaŭ kelkaj ellitovaj tradukoj. Hodiaŭ, verkoj de la litova literaturo estas troveblaj en la periodaĵo *Horizonto de Soveta Litovio*.

7.2.36 El la Nederlanda Literaturo

1887-1919: Antaŭ la Unua Mondmilito ne multe aperis. La novelo de J. J. Cremer *Frato Jaupik* (tr. J. Holst) aperis en 1908. En 1909 aperis la verketo de Multatuli (ps. de E. D. Dekker) *Naŭ Historioj pri l'Aŭtoritato* (tr. J. L. Bruin). *Ostlorn*, privilaĝa skizaro de S. Ul-

fers (tr. M. J. Wessel) aperis en 1911. Samjare aperis la unuakta komedieto de Van Driessche *Por Kvietaj Personoj* (tr. Amatus van der Biest). En 1913 aperis la dramo *La Ŝipeto* de J. Devos (tr. A. van de Velde).

1920-1941: En 1923 aperis la historia rakonto de Van Limburg Brouwer *Akbar* (tr. J. C. kaj J. R. G. Isbrücker). Samjare aperis *El la „Camera Obscura"* de Hildebrand (tr. Mees). En 1925 aperis la verketo de Luiscius Stipriaan *Karaktero* (tr. H. Bulthuis), 2-a eld. 1928. La aforismostila verko estis jam tradukita de J. Bruijn en 1912 (2-a eld. 1920). En 1926 H. J. Bulthuis tradukis la rakonton de Fr. van Eeden *La Malgranda Johano.* La Indoneziano Liem Tjong Hie tradukis el la fama kontraŭkoloniisma verko *Max Havelaar* de Multatuli la rakonton *Historio de Saidjah kaj Adinda,* 1927. En 1932 aperis la klasika verstragedio de J. van den Vondel *Gysbreght van Aemstel* (tr. J. R. G. Isbrücker). De la sama aŭtoro aperis en 1937 la biblia dramo *Josef en Dotan* (tradukita de grupo). En 1936 aperis la verketo *Surprizoj* de Ina Boudier-Bakker (tr. T. Flint). La socikritika romano de M. H. Székely-Lulofs *Kulio* (tr. P. J. Makkinje) aperis en 1939. Samjare aperis la rakontaro de Jef Last *La Hispana Tragedio* (tr. G. J. Degenkamp). Dummilite, en 1941, aperis la romano de A. M. de Jong *La Perfido* (tr. W. F. Kruit). Pli frue, en 1933 aperis la rakonto de W. G. v. d. Hulst *Jaĉjo Holm kaj Liaj Amikoj* (tr. H. C. van Leeuwen).

1942-1971: Postmilite ne mankis libro-eldonoj: la romano de Th. Thijssen *La Nevenkebla Ĝeno* (tr. F. Faulhaber) aperis en 1947. En 1951 aperis unu el la plej aktualaj kaj sukcesaj verkoj de Maurits Dekker, *La Mondo ne Havas Atendejon* (tr. F. Faulhaber): temas pri teatraĵo pri la atommilita danĝero. La psikologia romano de la filo de H. J. Bulthuis, la nederlandlingva verkisto Rico Bulthuis, *La Alia Pasinteco,* (tr. J. C. Isbrücker), aperis en 1952. La *Taglibro,* verkita dum dujara sinenfermiĝa eskapo el la nazioj far' de la juda knabino Anne Frank, aperis en 1959 laŭ traduko de G. J. Degenkamp. Satira verketo pri nia civilizo de E. Scheurmann, *La Papalagoj* (tr. Faulhaber), aperis en 1963 [2].

7.2.37 El la Norvega Literaturo

La unua verko aperinta libroforme estis *Prozo el Danaj-Norvegaj Aŭtoroj* (tr. Thomsen), 1908. De la internacistatura verkisto H. Ibsen aperis *La Reaperantoj* (tr. O. Bünemann), 1910 (2-a eld. 1925), *Imperiestro kaj Galileano* (tr. H. J. Bulthuis), 1930, kaj

2. Post la redakta fino ni aŭdis pri apero de *Nederlanda Bibliografio,* 1902-1972, kompilita de P. de Smedt (1972).

la drampoemo *Peer Gynt* (tr. E. A. Haugen), 1951. Tiu lasta estas verŝajne la plej bona traduko el la norvega, sence kaj forme eleganta kaj fidela.

De la alia internacistatura verkisto norvega Bjørnstjerne Bjørnson aperis du rakontoj: *Gaja Knabo* (tr. L. Sandberg kaj D. Johansen), 1934, kaj *Synnøve Solbakken* (tr. E. kaj A. Weide), 1939. De la tria grava verkisto norvega, Knut Hamsun, aperis la verko *Victoria* (tr. O. Rygg), en 1938. *Norvega Kantareto*, pretigita de Liv Sandberg, aperis en 1936. Pluraj tradukaĵoj aperis dise en la Esperanta gazetaro, ĉefe tamen en *Norda Prismo* (1955-). Utila estas la *Norvega Bibliografio*, de L. K. Hunnes, 1964.

7.2.38 El la Persa Literaturo

En 1908-09 la Anglo George Cox publikigis elektitajn novelojn el la *Mil kaj Unu Noktoj (Aladin, Ali Baba, La Aventuroj de la Kalifo Harun Alraŝid)*. De Omar Kajam aperis du tradukoj. La unua, aperinta en 1952, estis farita de C. M. Bean surbaze de la traduko anglalingva pretigita de Edward Fitzgerald. La dua, aperinta en 1953 *(Poemoj)*, estis farita de G. Waringhien surbaze de la originala irana prateksto. Ĝi estas tamen ne nur filologie supera al la unua, sed ankaŭ poezie kaj stile.

7.2.39 El la Pola Literaturo

1887-1918: La unuaj esperantistoj estis Poloj kaj Rusoj. Pro tio, ĉefe en la unuaj tempoj de Esperanto, la tradukoj el la pola abundas. La unua verko libroforme aperinta estas du rakontoj, tradukitaj de A. Grabowski, 1891: unu de Prus *(La Nova Jaro)*, la alia de Sienkiewicz *(Janko-Muzikanto)*.

En 1904 aperis la poemaro de Słowacki *En Svisujo* (tr. Grabowski), kaj la verko *La Patro de Pestuloj* (tr. Grabowski), 1905. De Mickiewicz aperis la verketo *Sinjorino Twardowska* (tr. Grabowski), 1904 kaj la dramo *Improvizacio de Konrad* (tr. I. Dobrzański), 1910 (2-a eld. 1924). De Wacław Sieroszewski aperis la novelo *La Fundo de l' Mizero* (tr. K. Bein), 1904 (2-a eld. 1907, 3-a eld. 1926). Tre ŝatata estis la verkistino romantika kaj progresema Eliza Orzeszkowa (ps. Orzeszko). El ŝiaj verkoj aperis la amrakonto *La Interrompita Kanto* (tr. K. Bein), 1905 (4-a eld. 1928), *Bona Sinjorino* (tr. K. Bein), 1909 (2-a eld. 1924), la novelo *A....B....C....* (tr. Ender), 1909 (2-a eld. 1957), la romano *Marta* (tr. L. L. Zamenhof), 1910 (4-a eld. 1968), kaj noveleto *La Ĝemo de la Vivo* (tr. M. Czerwiński), 1912. En 1907 aperis la traduko de la trivoluma roma-

Antoni Grabowski (dekstre): Lia grandioza kontribuo al la maturiĝo de la lingvo (ĉefe per multnombraj tradukoj el pluraj lingvoj) ankoraŭ restas en la ombro de la Zamenhofa genio.





Kazimierz Bein (Kabe), la unua stilisto de la Internacia Lingvo, kune kun Zamenhof kaj Grabowski – la plej brila nomo de la Unua Periodo en la Esperanta beletro.

no de Bolesław Prus *La Faraono*, ĉefverko de la tradukarto de K. Bein: tion pruvas la fakto, ke ties 4-a eldono aperis en 1957. De Prus aperis ankoraŭ rakonto: *Pekoj de l'Infaneco* (tr. Grabowski), 1913 (2-a eld. 1963). Du tragediojn klasiktemajn tradukis Leono Zamenhof: *Aspazio* de Świętochowski (1908) kaj *Protesilas kaj Laodamia* de Wyspiański (1908). De Wł. Reymont aperis pluraj noveloj kaj rakontoj (tr. Bein) en 1908 kaj 1910, novelaro *Ave Patria* (tr. Leono Zamenhof), 1909, kaj *El la Konstituciaj Tagoj* (tr. Zetel), 1910. Pluraj estis ankaŭ la tradukaĵoj el Sienkiewicz. Krom *Janko-Muzikanto* (1891) aperis *La Juĝo de Oziris* (tr. Grabowski), 1908, *Ni Sekvu Lin* (tr. Br. Kuhl), 1909, la drambildo *Kiu Estas Kulpa?* (tr. Br. Kuhl), 1912, kaj la humura rakonto *Ŝi la Tria* (tr. A. Grabowski), 1913.

De J. A. Fredro aperis la komedio *Consilium Facultatis* (tr. A. Grabowski), 1909, kaj de Bałucki aperis la rakonteto *Ama Bileto* (tr. Ender), 1909. La *Legendoj* de Niemojewski estis eldonitaj en 1911 (tr. Br. Kuhl), kaj la postan jaron 1912 aperis *Rakontoj* de Maria Konopnicka, 2-a eld. 1964. *Halka*, la kvarakta opero de Wolski (muziko de Moniuszko, kantita dum la Krakova Kongreso en 1912), aperis en 1912 en traduko de Grabowski. La tragedio de Słowacki *Mazeppa* (tr. A. Grabowski) aperis en 1912. Samjare aperis verketo de Żuławski (tr. Grabowski) kaj verketoj de Gasiorowski. La kvarakta dramo de Przybyszewski *La Neĝo* (tr. T. Ficowski) aperis samjare. En 1912 aperis krome 6 poemoj el la *Libro de Profetoj* de Lange (tr. A. Grabowski). La postan jaron aperis la verketo de Dygasiński *Lupo, Hundoj kaj Homoj* (tr. Br. Kuhl). En 1918 aperis la eposo de A. Mickiewicz *Sinjoro Tadeo*, en la klasika traduko de A. Grabowski, kiu sciis redoni elegante kaj precize la originalon (2-a eld. 1955).

En ĉi tiu periodo aperis la unua esperantlingva antologio, la modesta, nur prova *Pola Antologio*, pretigita de K. Bein, 1906. Kolekto el tradukpoemoj ĉefe elpolaj estas *Sonoj Esperantaj*, de Leo Belmont (ps. de Blumenthal), 1908.

1920-1939: En 1923 aperis *El la Lando de Ruino* de Wyslouch (tr. S. Kornfeld). De Sienkiewicz aperis pluraj verkoj intermilite: i.a. *Noveloj* (tr. Lidja Zamenhof), 1925, *Quo Vadis?* (tr. Lidja Zamenhof), romano pri antikva Romo, 1933 (2-a eld. 1958), la rakonto *Orso* (tr. A. Oberrotman), 1933, kaj scenoj el *Tra la Dezerto* (tr. W. van Zon), 1936. De St. Baliński aperis *La Lasta Kravato de Aleksy* (tr. Karolczyk), 1925. En 1927 aperis *Bonhumoraj Rakontoj* de Korczak (tr. A. Weinstein). Porsceneja verketo de Bałucki *Kuzeto* (tr. S. Kornfeld) aperis en 1928. Du noveloj de B. Prus, tradukitaj de Lidja Zamenhof, aperis en 1932. La romano de J. Wolski, *Ĉu Ĝi Estas nur Fabelo?* (tr. R. Dąbrowski) aperis en 1935.

1940-1971: Pro la milito unue, pro la malfavoraj politikaj cirkonstancoj poste, libroj en Esperanto povis aperi en Polio nur ekde 1957. En 1957 aperis *Medalionoj* de Zofia Nałkowska (tr. Hodakowski), rakontaro pri suferoj sub la nazia regado. Aperis, krome, poemaro de Julian Tuwim en Esperanta traduko (1956), kaj *Kiel Esti Amata,* de K. Brandys (tr. Jerzy Grum), 1964. Samjare aperis *Sur la Nobla Ĉevalo* de Andrzej Szczypiorski (tr. W. Więcko). Krome, venis multaj reeldonoj, tre bonvenaj, de malnovaj verkoj.

En 1955 aperis interesa literaturhistoria verko: *Adam Mickiewicz,* de Mieczysław Jastrun.

7.2.40 El la Portugallingva Literaturo

El la portugalaj literaturoj aperis 2 antologioj: *Antologio de Brazilaj Rakontoj* (kun verkoj de 3 aŭtoroj), redaktita de A. Caetano Coutinho, 1953, kaj *Antologio de Portugalaj Rakontoj,* redaktita de Manuel de Seabra, 1959.

Ĉefe en Brazilo estas aktiva, forta spiritista literatura grupo. Ĝi eldonis multajn beletraĵojn. I.a. aperis la tradukverko de F. V. Lorenz *Voĉoj de Poetoj en la Spirita Mondo,* 1944, la romanoj de Francisco Cândido Xavier *Antaŭ 2.000 Jaroj* (1951), *Nia Hejmo* (1959), *Ago kaj Reago* (1963), *Paŭlo kaj Stefano* (1966), ĉiuj tradukitaj de L. C. Porto Carreiro-Neto. En 1970 aperis ankaŭ la spiritisma romano de Almerindo Martins de Castro *La Turmentego de la Memmortigintoj.*

Ne mankas kompreneble ankaŭ alispecaj verkoj. Tiel, aperis la porinfana komedieto de Coelho-Netto *La Korvo kaj la Vulpo* (tr. Nuno Baena), 1922. La komedio de Arthur Azevedo *Amo per Proverboj* (tr. A. Couto Fernandes) aperis en 1920 (2-a eldono 1932). En 1931 la verko tradukita de Kalocsay *Eterna Bukedo* prezentis fragmenton el *La Luziadoj* de Camões. La verketo de Alencar *La Vidvineto* (tr. L. C. Porto Carreiro-Neto) aperis en 1946. La biografio de la fama politikisto *Rui Barbosa,* de Fernando Nery (tr. J. Joels) aperis en 1949. De la fama verkisto Castro Alves aperis la poemo *La Negrista Ŝipo* (tr. F. V. Lorenz), 1947, kaj *Elektitaj Poemoj,* 1959, en la valora poezia traduko de la poeto L. H. Knoedt. De la mondfama verkisto Machado de Assis aperis *Teatro* (kun 4 komedioj) en 1958. La komedio de Joracy Camargo *Dio Rekompencu Vin* (tr. Sylvio Peixoto) aperis en 1959, kaj traduko de filozofia verko de Huberto Rohden, *Imperativoj de la Vivo,* en 1963.

Mallonga, sed por nefakuloj utila verketo estas *Historio de la Portugala Literaturo* de Agostinho da Silva (tr. Manuel de Freitas), 1948.

7.2 ĈEFAJ VERKOJ

7.2.41 El la Provenca Literaturo

Verŝajne sola libroforme aperinta verko estas la grava poemo *Mirejo* de Mistral, poezie tradukita de Paul Champion kaj E. Noël, 1909.

7.2.42 El la Retoromanĉa Literaturo

En *Svisa Antologio*, 1939, troviĝas bonega poemkolekto (en traduko de K. Kalocsay) kaj enkonduko de Arthur Baur (redaktoro de la antologio kaj samtempe tre konata romanĉ-lingvisto). Verketo de la ladina (t.e. engadindialekta) poeto Peider Lansel *La Retoromanĉoj* (tr. de Agricola, ps. de Hans Jakob), 1938, donas historiajn kaj etnologiajn informojn pri la retoromanĉaj valoj.

7.2.43 El la Rumana Literaturo

La ĉefa tradukisto elrumana estis Tiberiu Morariu. En lia traduko aperis en 1927 novelaro de Brătescu-Voineşti *Niĉjo Mensogulo* (kaj aliaj noveloj), en 1929 la rakonto de Mihail Sadoveanu *Nobela Peko* kaj en 1930 la poemaro en prozo de Emil Isac *Sonorilo kaj Kanono. Rumana Bonhumoro en Elektitaj Rakontoj* tradukis kaj aperigis en 1932 P. Firu kaj Sigismundo Pragano.

En la ĉefaj literaturaj gazetoj en Esperanto, precipe post la Unua Mondmilito, aperis dise multaj tradukoj el la rumana. En la kadro de la pupteatra movado aperis pupteatraĵoj de A. Popescu (tr. J. Petrin, 1970), kaj de Aleko Popoviĉi (tr. Petrin kaj Sigmund, 1971).

7.2.44 El la Rusa Literaturo

1887-1914: La unuaj esperantistoj estis Poloj aŭ Rusoj. Tio eksplikas la fakton, ke tre multaj el la plej fruaj tradukaĵoj estis faritaj el la pola kaj el la rusa. Jam en 1889 aperis *Princino Mary*, rakonto de Lermontov (tr. E. de Wahl): ĝia dua eldono, aperinta kun la mankanta parto, eliris sub la titolo *Princidino Mary* en 1896. En 1894 aperis la orienta rakonto *Demono* (tr. N. Devjatnin), la turka novelo *Aŝik Kerib*, 1895 (tr. N. Kuŝnir) kaj en 1912 *Novaj Versaĵoj* (tr. Boris Mirski), ĉiuj verkoj de Lermontov.

De Romanov (sub la pseŭdonimo K.R.) aperis la 3-akta dramo *Renaskita Manfred* (tr. Majnov), 1891, kaj en 1914 (2-a eld. 1923) la kvarakta dramo *La Reĝo Judea* (tr. N. Devjatnin).

De A. S. Puŝkin aperis verkoj tre frue: *La Neĝa Blovado* (tr. Grabowski) (1888); ĝi estis retradukita fare de A. Fiŝer en 1923: *Neĝblovado*. En 1894-95 aperis la dramo *Boris Godunov* (tr. A. Grabowski), 2-a eld. 1906. Ankaŭ la teatra ĉefverko *Ŝtona Gasto* (tr. N. Borovko) aperis en 1895. Poste aperis la dramaj scenoj *Mocart kaj Saljeri* (tr. Vs. Lojko), 2-a eld. 1907; en 1906 la verko *Poltavo* (tr. Devjatnin); kaj en 1913 la novelo *La Pafo* (en progresema lingva traduko de A. Fiŝer), 2-a eld. 1923.

De Vl. Korolenko aperis du verkoj: *Fantomoj* (tr. Vl. Gernet), 1896, kaj *Arbaro Bruas* (tr. M. Ŝidlovskaja), 1914.

Sed la verkisto, el kies verkaro oni plej multe tradukis dum la unuaj tempoj, estis certe Lev Tolstoj. Oni aperigis rakontojn, filozofiajn verkojn, religi-etikajn traktaĵojn. El la rakontoj, ni rimarkas la aperon de *Dio Ĉiam Veron Vidas*, 1895, tradukita de Lojko (refoje tradukita de Kabanov en 1912); en 1912 aperis pluraj tradukoj faritaj de N. Kabanov: *Kie Estas Amo Tie Estas Dio, Per Kio Homoj Estas Vivaj, Du Maljunuloj, Sieĝo de Sebastopolo*. Lingve kaj enhave interesa estas la komedieto *Unua Brandfaristo* (tr. A. Burenkov), 1896; la rakonto *La Konfeso* (tr. M. S. Tenner) aperis en 1911. Samjare aperis *Mia Onklino Tatiana Aleksandrovna* (tr. J.Flourens). Multon tradukis ankaŭ Anna Ŝarapova: *Unu Animo en Ĉiuj* (rakonto), 1912, *Dio — Unu por Ĉiuj* (rakonto), 1912, *La Morto de Ivano Iljiĉ* (romano), 1913.

De Vs. Garŝin aperis 2 rakontoj (tr. N. Kazi-Girej) en 1896: *Kvar Tagoj* kaj *Attalea Princeps*, krome, la rakonto *Ruĝa Floro* (tr. Boguševiĉ), 1905, *Legendo pri Fiera Ageo* (tr. N. Kabanov), 1916, kaj la rakonto *Signalo* (intermilite).

De Maksim Gorkij bedaŭrinde la rikolto ne estas riĉa. Aperis en 1906 la verko *Bolesĉjo* (tr. Iv. Seleznjov) kaj, en la verko *Du Slavaj Rakontoj, La Rakonto de Filip Vasiliĉ* (tr. V. Dufeutrel), 1908.

Rakontoj de L. Andrejev aperis en 1906: *Ruĝa Rido* (tr. F. Avilov) kaj en 1909: *Rakonto pri Sep Pendigitoj* (tr. I. Ostrovski). En 1906 aperis verketo de Nemiroviĉ-Dancenko *Reviviĝinta Kanto* (tr. W. Erdmann). Pli abunda estas la rikolto el verkoj de N. V. Gogol: la kvinakta komedio *La Revizoro* aperis en 1907 en bona traduko de L. L. Zamenhof. La rakonto *Maja Nokto* (tr. R. Frenkel) aperis en 1912. En 1911 aperis la verko *Portreto* (tr. A. Fiŝer), samjare la verketo *La Mateno de Aferisto* (tr. A. Arumov). Proksimume en la sama periodo aperis ankaŭ la monologo *La Frenezulo*.

Ankaŭ el la verkoj de Iv. Turgenev la rikolto estas abunda. En 1908 aperis *Kanto de Triumfanta Amo* (tr. A. Fiŝer). La verko *Patroj kaj Filoj* aperis en 1909, en nekutime misflegita traduko de K. Bein. Samjare aperis la prozlirika verko *Versaĵoj en Prozo* (tr. K.

Bein). La postan jaron aperis la verko *Anjo* (tr. A. Fiŝer kaj V. Zamjatin). En 1912 aperis la fantaziaĵo *Fantomoj* (tr. A. Fiŝer). La postan jaron oni publikigis *Stranga Historio* (tr. M. Ŝidlovskaja). Fine, en 1914, aperis *La Faktoro* (tr. A. Jodko).

De Ĉirikov aperis la rakonto *En Malliberejo* (tr. K. Bein), 1909. De Dmitrij N. Mamin-Sibirjak aperis *Rusaj Rakontoj* (tr. N. Kabanov), 1909 (2-a eld. 1924); *Fabloj* de Krilov (tr. Devjatnin) en 1910. La postan jaron aperis *Du Rakontoj* de Ĉeĥov (tr. B. Kotzin). De Aleksej Konstantinoviĉ Tolstoj aperis la historia romano *Princo Serebrjanij* (tr. M. Ŝidlovskaja), 1912; samjare la verko de Naĵivin *Kion Parolas la Steloj* (tr. M. Fetisov), retradukita de N. Kabanov en 1915. La rakonto de Timkovskij *Salajro* (tr. T. Ŝĉavinskij) aperis en 1914, la postan jaron la verko de F. Dostoevskij *Blankaj Noktoj* (tr. S. Belorukov).

En 1914 aperis interesa verketo en Odeso: *Intima Parolad'*, poezio de rusaj ego-futuristoj (tr. Ilarij of Robis, ps. de Nikolaj Borisov).

Interesa kolekto el verkoj elrusigitaj estas la *Plena Verkaro* de N. Devjatnin (kvar volumoj aperintaj inter 1906 kaj 1911).

1915-1949: La milito unue, poste la rusa revolucio kaj la rusa civila milito signifis paŭzon en la apero de literaturaĵoj. Sed tuj post la malapero de la „militkomunismo" montriĝis, ke la kultura vivo en Esperanto estis vigla kaj talentriĉa. Pluraj verkoj aperis en Sovetio, sed granda parto, ĉefe la prisocialismaj, aperis en Leipzig (SAT, Ekrelo). La soveta Esperanta literatura „plejado" estis perforte haltigita de la stalina malpermeso.

De V. G. Avsejenko aperis la verketo *Fraŭlino Suzano* (tr. P. Medem), 1919. En 1921 aperis la poemo *Monna Liza* de Miĥail Gerasimov (tr. N. Nekrasov). Du verkoj de Blok aperis en 1922 resp. 1924: *Dekdu* kaj *Najtingala Ĝardeno* (ambaŭ tr. de Nekrasov). La verko de Korolenko *La Senlingvulo* (tr. M. Ŝidlovskaja) aperis en 1922, la prirevolucia rakonto de Aleksandr Drozdov *Krucumo* (tr. N. Hohlov) en 1922, la poemo de K. D. Balmont *Blanka Cigno* (tr. Nekrasov) en 1923. De la sama aŭtoro aperis en 1921 ankaŭ *Elektitaj Versaĵoj* (tr. Nekrasov).

Abundas ankaŭ rikolto el verkoj de Puŝkin: En 1923 *Tri Noveloj: Pikreĝino, Neĝblovado, Pafo* (tr. A. Fiŝer), en 1927 la grava romano *La Kapitanfilino* (tr. M. Ŝidlovskaja), kaj en 1931 la versromano *Eŭgeno Onegin* (tr. N. Nekrasov).

De Turgenev aperis *Elektitaj Noveloj* (tr. A. Mexin), 1923. De Vas. Doroŝeviĉ aperis la satiraj *Orientaj Fabeloj* (tr. N. Hohlov), 1924. Samjare aperis rakonto de V. Garŝin: *Signalo.* En 1924 aperis ankaŭ *Rakontoj* de Ĉeĥov (tr. P. Hitrov), kaj en 1925, de la sama aŭtoro, la komedieto *La Urso* (tr. N. Devjatnin),

La kristnaska rakonto de V. Korolenko *La Sonĝo de Makaro* (tr. M. Ŝidlovskaja) aperis en 1927. En 1929 sekvis la priestonteca romano de A. Bogdanov *Ruĝa Stelo* (tr. Nekrasov kaj S. Rublov). La romano de Aleksej Nikolajeviĉ Tolstoj *Aelita* (tr. E. Pill) aperis en 1928, samjare, de la sama aŭtoro, ankaŭ la tragedio *La Morto de Danton* (tr. N. Hohlov).

La socialista dramo de S. K. Lalikov *Versala Kaptito* (tr. Ŝ. Goldfeder) aperis en 1929; samjare aperis ankaŭ la verko de Lev Tolstoj *Ĥodinka*. La poemon de Vl. Majakovskij *Per Voĉo Plena* (1930) aparte bone tradukis Hohlov, Nekrasov kaj Rublov. La moderna kvarakta dramo de B. Lavrenev *Disrompo* (tr. H. Sazonova) aperis en 1931, la socitendenca verko de F. Svjatenko *Nova kaj Malnova Uzinmajstro* (tr. Ŝvedova) aperis samjare. La teatraĵo de O. Demenskij *Nigra Pano* (tr. A. Jürgensen) aperis en 1932. Samjare venis ankaŭ la revolucia rakonto *La Submarinistoj*, de Novikov-Priboj (tr. E. Blinov). La verko de D. Furmanov *Ĉapajev* (tr. de grupo, en kiu Devjatnin) aperis en 1933.

En la sama periodo en Leipzig estis eldonita la verketo de Maksim Gorkij *Kiel Mi Lernis*, 1931.

En 1937 aperis noveloj de Mamin-Sibirjak kaj de Lermontov (tr. Filatov).

El la literaturhistoria vidpunkto valora estas la originala studo de N. Nekrasov *Patri-Ideo en Nuna Rusa Literaturo*, en *La Nova Epoko*.

1950-1971: En 1950, cetere en Okcidento, aperis la rakonto de Naĵivin *Kiso de la Reĝino* (tr. D. Staritsky). De la sama tradukinto aperis ankaŭ *Kaŭkazaj Rakontoj*, de Lermontov, 1964.

Ree komenciĝis la esperantista vivo en Sovetunio: unue singarda kaj modesta, poste kvalite ĉiam pli alta. En 1964 aperis *Elektitaj Versaĵoj* de Lermontov, en 1965 *Versoj Elektitaj* de S. Jesenin, samjare *La Sorto de Homo* de Miĥail Ŝoloĥov, en 1967 *Bone! Poemo de l' Oktobro* de Vl. Majakovskij. Ilin tradukis ĝenerale grupo, en kiu elstaras la poeto K. Gusev.

En 1969 aperis ankaŭ la porjunulaj *Du Noveloj* de Arkadij Gajdar (tr. V. Samodaj kaj E. Ostroĵnikova).

En 1966 aperis *Kantoj de 15 Sovetaj Respublikoj*. En 1967 estis la vico de la kantaro *Kantoj de Niaj Patroj*. En ĝis nun 3 kajeroj aperis *Kantoj de Sovetaj Komponistoj*.

7.2.45 El la Sveda Literaturo

Bonan superrigardon pri la moderna sveda literaturo donas la unua volumo de *Sveda Antologio* (1934). En 1950 aperis la *Sveda Novelaro* (tr. F. Szilágyi), kun 20 noveloj de 16 aŭtoroj. Ankaŭ



Stellan Engholm: Grava nomo en la originala kaj traduka beletroj de la Internacia Lingvo.

Kaŭkazaj Rakontoj: Ĉefverkoj de la rusa literaturo ankoraŭ atendas sian aperon en Esperanto.





Per pluraj volumoj la sveda verkistino Selma Lagerlöf estas bone reprezentita en la traduka beletro de la Internacia Lingvo.

antologiecan karakteron havas la verko de Magda Carlsson *Sveda Poemaro* (1954) kun verkoj de 29 svedaj poetoj.

De la nobelpremiita (en 1909) verkistino Selma Lagerlöf ekzistas en Esperanto reprezenta rikolto: en 1908 aperis la rakontoj *Reĝino de l'Arbaro* kaj *Sur la Fundo de l'Granda Kungahella* (tr. Bäckström), en 1930 la romano *La Junulino el Stormyr* (tr. O. Frode), en 1933 la rakonto *La Infanoj de Betlehem* (tr. O. Frode), en 1933 la romano *La Mono de Sinjoro Arne* (tr. Stellan Engholm), la postan jaron la romano *Gösta Berling* (tr. S. Engholm), kaj en 1938 aperis la romano *La Ringo de la Generalo* (tr. S. Engholm).

De la mondsignifa dramverkisto August Strindberg aperis ankaŭ tre valoraj verkoj: La naturalisma dramo *Fraŭlino Julie* (tr. P. Nylén kaj S. E. Krikortz) en 1908, samjare la unuaktaĵo *Pario* (tr. B. Ström), en 1926 la verko *Insulo de la Feliĉuloj* (tr. Oskar Frode), en 1928 la verko *La Konscienco Riproĉas* (tr. G. H. Backmann), kaj en 1935 la dramo *Pasko* (tr. St. Engholm).

De aliaj verkistoj libroforme aperis malmulto. De E. Flygare-Carlén aperis la verketo *La Literaturisto kaj Lia Fianĉino* (tr. Otto Zeidtlitz), 1895, en 1946 aperis la romano de D. Flood *Mi Serĉis Oron kaj Oleon, sed Trovis* ... (tr. K. Gustafsson).

Multaj literaturaĵoj aperis en la ĉefaj revuoj de la Esperanta Movado: multaj precipe en *Literatura Mondo* kaj en *Norda Prismo*. Tre aktivis sur traduka kampo Stellan Engholm, F. Szilágyi, Magda Carlsson, O. Frode, k.a.

Aperis 2 kantaroj: unu pretigita de G. Löfvenmark (1908), kaj la dua de Malmgren (1931, 4-a eld. 1934).

7.2.46 El la Ukrajna Literaturo

En 1909 aperis la verko *Pjatizlotniko*, de Kocjubinski (tr. M. Korotkij). En 1912 aperis la poemo de la fama verkisto Taras Ŝevĉenko *Katerino* (tr. N. Devjatnin). La novelo de S. Martos, *Deziro de Diakono* (tr. Anatol Koĥ), aperis samjare. En 1936 aperis la novelo de S. Marŝak *Mr. Twister* (tr. R. Estont). Nur en 1971 ekaperis novaj literaturaĵoj libroforme: valora estas la verko *Liriko* de Lesja Ukrainka, redaktita de Nadja Andrianova, kun tradukaĵoj pretigitaj de Andrianova, Gusev, Kobo, Logvin, Dresen.

7.2.47 El la Uzbeka Literaturo

En la lerta traduko de Petro Poliŝĉuk aperis la legendo de Ŝaraf Raŝidov *La Kaŝmira Kanto*, 1967, kaj la socipriskriba lirika verko de Ĥamid Alimĝan *Zejnab' kaj Aman'*, 1968.

7.2.48 El la Vjetnama Literaturo

La eldono de esperantlingvaj literaturaĵoj komenciĝis en Norda Vjetnamo antaŭ proks. 12 jaroj. Ilin tradukas ĝenerale la Hanoja Esperanto-Grupo, kaj ilin eldonas la Fremdlingva Eldonejo en Hanojo.

La debuto estis la legendkolekto *Monto de l' Virino, Kiu Atendas Sian Edzon*, 1959. Baldaŭ sekvis la rakontaro de la Taj-naciminoritato *La Geedzoj A Fu*, de To hoai, 1960. Samjare aperis la novelkolekto pri la kontraŭfranca rezistado *Pro Unu Bovino*. En 1961 aperis la romano samtema de Bui duc ai *Franjo Tu Hau*. En 1962 aperis la novelkolekto de Tran do *Djen Bjen Fu*. La verko de To hoai *La Aventuroj de Zemen* aperis en 1963. Ankoraŭ pri la kontraŭfranca gerilo temas la romano de Huu mai *La Lasta Altaĵo*, 1963. Pri la kontraŭusona gerilo temas la novelaro *La Morto de Jankio*, 1964. La socirealisma romano de Nguyen kong hoan (el 1938), *Senelirejo*, aperis en 1963.

De nun, preskaŭ ĉiuj eldonaĵoj pritraktas la kontraŭusonan rezistadon aŭ la sudvjetnaman naciliberigan batalon: la novelaro *Meze de l' Flamoj*, 1965; *La Ebura Kombilo*, 1967; la romano de Anh duk *Hon Dat*, 1968. Lastaj eldonaĵoj estas la novelaro de Nguyen sang *La Drinkejo de l'Mutulo* kaj la romano de Ho phuong *Kan Lik*, 1969. En 1971 aperis la novelkolekto de 19 aŭtoroj *La Horloĝisto de Djen Bjen Fu*.

Tagkajero en Prizono de Ho chi minh, 1966, kaj *Elektitaj Poemoj* de To huu, 1964, kompetente tradukis Dao anh kha. Aperis krome politikaj kaj prisociaj eldonaĵoj.

7.3 ANTOLOGIOJ DE TRADUKOJ

7.3.1 Enkonduko

Ni jam aludis pri la antologioj en la ĉapitroj dediĉitaj al la naciaj literaturoj en Esperanto. Tamen, la fakto, ke en Esperanto aperis pluraj antologioj internaciaj kaj ke tiuj antologioj havas apartan signifon por la Esperanta kulturo, ĉu literaturhistorie, ĉu pure lingve, devigas nin pritrakti ilin iom pli detale, ankaŭ pro nura informa celo.

7.3.2 La Unua Periodo

La unua traduka poemkolekto estas *La Liro de l'Esperantistoj,* de A. Grabowski (1893), kiu enhavis versaĵojn jam aperintajn en *Lingvo Internacia.* Tiu libreto estas unu el la fontoj, el kiuj ĉerpis la poezia parto de *Fundamenta Krestomatio.* En 1902 aperis la unua eldono de *Esperantaj Prozaĵoj,* kolekto el originalaj kaj tradukitaj noveloj, eseoj, rakontoj, prilingvaj artikoloj el *L' Espérantiste.* Fine, en 1903 (17-a eld. en 1954) aperis *Fundamenta Krestomatio,* kolekto el modelaj, stile „klasikaj" verkoj, poemoj, prozaĵoj, originalaj kaj tradukitaj. La stilon glatigis L. L. Zamenhof.

La signifo de tiuj verkoj estas ĉefe lingva kaj tradicikrea: ili estas belstilaj ekzemploj, pli-malpli pure zamenhofaj, tiuj de FK kontrolitaj de Zamenhof mem, tiuj de EP kontrolitaj de L. de Beaufront. Ili vekis imitemon kaj ŝaton por la klasika stilo — sed ankaŭ malhelpis, iel bremsis pluan, originalan ellaboron.

La vera momento de la antologioj naskiĝis en 1906, kiam aperis la klasikstila, *Pola Antologio* (nur prozaĵoj), redaktita kaj tradukita de K. Bein, kiu troviĝis en la ascendo-branĉo de sia literatura kariero. En 1907 la sama aŭtoro eldonis *Internacia Krestomatio,* verketon el 7 lingvoj. Inter 1907 kaj 1908 aperis duvoluma *Hungara Poemaro,* iom malmatura provo traduki el 4 poetoj, kaj el la hungara kantaro, tradukita de Fiedler, Marich, Altenburger kaj Rajczy. Nur la plena liberiĝo de la latentaj lingvoesprimaĵoj igos tiujn provojn sukcesaj. Citendas ankoraŭ *Hungaraj Popolkantoj* (unua volumo 1908, dua volumo 1917).

En 1908 aperis *Prozo el Danaj-Norvegaj Aŭtoroj* de Thomsen, kaj *Sonoj Esperantaj* de Leo Belmont (Leo Blumenthal), kun tradukaĵoj el la pola kaj el aliaj lingvoj. *Nova Antologio* el la pola, en 1909 (represo en 1965), estis tradukita de A. Grabowski. *Japanaj Rakontoj,* en traduko de Ĉif tošio, aperis en 1910, kaj estis sukcese reeldonita dufoje. *Kroataj Poeziaĵoj* estas antologiforma libro redaktita kaj pli-malpli interese tradukita de la jugoslavo Mavro Špicer (1912).

Sed la tiama tradukpoezia ĉefverko estas sendube *El Parnaso de Popoloj,* de Antoni Grabowski, kun verkoj tradukitaj el 30 lingvoj (nome el la angla, bohema, bulgara, dana-norvega, finna, flandra-nederlanda, franca, germana, greka antikva kaj moderna, hispana, hungara, itala, japana, kartvela, kataluna, kašuba, kroata, latina, litova, luzica, pola, portugala, provenca, rumana, rusa, serba, slovaka, slovena, sveda, ukrajna). Multaj famaj poetoj troviĝas en ĉi tiu antologio, verkita en lingvo jam matura (1913!), esprimriĉa, belritma kaj rim-abunda. Eble la tradukaĵoj el nepolaj aŭtoroj aspektas iom

unutonaj, sed la pola parto estas elstara. En ĝi ni trovas la mezurilon por la estontaj tradukistoj.

En 1913 aperis en Moskvo *Orienta Almanako,* kun tradukaĵoj el la araba, armena, ĉeĉena, hebrea, hindia, ĉina, japana, kartvela, lezgina, sanskrita kaj tatara lingvoj. Verkon hodiaŭ nekonatan aperigis iu „Narciso" en Saratov: *Armena Poezio,* malgranda poemkolekto. Saĥarov, en 1915, aperigis verkon, pri kiu oni ne plu multe parolas, eble maljuste: *Esperanta Krestomatio,* kun literaturaj provoj el 42 popoloj.

Fine, en 1921, aperis alia grava, kvankam negranda verko de Grabowski: *Postrikolto,* kiu, krom tradukaĵojn, prezentis ankaŭ originalajn verkojn.

7.3.3 La Dua Periodo

Bona, kvankam malgranda antologieto el bohema poezio aperis en 1920: *Bohemaj Grenatoj,* de St. Schulhof. El la ĉina kaj japana klasikaj literaturoj tradukis Ossaka kenĵi en libro aperinta en 1921: *Perloj el la Oriento.* En 1923 aperis *Litova Almanako,* al kiu kunlaboris traduke multaj esperantistaj beletristoj. Sed jam estis ia tempo de la influa Budapeŝta Skolo: Kalocsay debutis traduke en la poezia kampo per la libro *Kantanta Kamparo* (1923), antologio el popolkanzonoj de Hungario. Aliaj kanzonoj hungaraj aperis en 1928, kaj, en traduko de Kalocsay, ankaŭ en 1929.

En 1925 aperis unu el la mejloŝtonoj de la Esperanta tradukliteraturo: *Kataluna Antologio,* redaktita de Jaume Grau-Casas, kun la kunlaboro de aliaj 14 kuntradukintoj. La abundo de filologiaj notoj, la lingvoscienca enkonduko, la prezento kaj la amplekso, kaj la literatura valoro de la tradukaĵoj fiksis la nivelon, kun kiu poste ĉiu antologio estis komparata. Samjare, la pli modesta *Hejma Prozo* de J. Bremón-Masgrau konatigis prozaĵojn ĉefe el la kataluna. En 1925 aperis ankaŭ la *Bulgara Antologio,* ĉefredaktita de Iv. Krestanov (la poeziajn tradukojn pretigis tamen K. Kalocsay). En 1927 aperis, en traduko de Ed. Jaunvalks, *Latvaj Kantoj en Esperanto,* kaj samjare Julio Mangada-Rosenörn aperigis antologiforman libron *El Moderna Hispana Parnaso,* kun poeziaj tradukoj el la hispana. *Belga Antologio,* kun du partoj, la flandra kaj la valona (1928), en la respektiva ĉefredakto de H. Vermuyten kaj de M. Jaumotte, prezentas valoran elekton el la plej reprezentaj verkistoj belgo-devenaj.

Poemaro el Hungarlando (1929), estis lerte pretigita de F. Szilágyi, kiu tiam ankoraŭ laboris ĉefe sur la poezia kampo. K. Kalocsay aperigis en 1931 gigante pensitan kaj finportitan poezian tradukantologion *Eterna Bukedo,* kun verkoj de 115 aŭtoroj, el 22 lingvoj, kie


Pola Antologio
K. KALOCSAY
ETERNA BUKEDO
HUNGARA ANTOLOGIO
EL JAPANA LITERATURO
BULGARA ANTOLOGIO
antologio
PORTUGALAJ
LATVA POEZIO
BELGA ANTOLOGIO
DANA
O. GINZ KAJ STAN. KAMARYT
ČEHOSLOVAKA
ANTOLOGIO
Sveda
Čina
EL ORIENTA FLORBEDO

lumture brilas la genia kapablo de la aŭtoro modli la lingvon flekseble kaj esprimive, pere de la esprimrimedoj latente ekzistantaj en la lingvo. Sub la ĉefredakto de Hilda Dresen aperis en 1932 *Estona Antologio*, je kies nasko helpis 16 kromaj tradukintoj. Temas pri alia, altnivela produktaĵo de tiu riĉa epoko.

El la ĉina, japana kaj korea tradukis Ito saburo en verko aperinta en 1932: *Verda Parnaso*. En 1933, alia traduka ĉefverko: *Hungara Antologio*, kies ĉefredaktoroj estis K. Kalocsay kaj J. Baghy kaj kies redaktoroj estis, krome, Bodó, Halka, Szilágyi kaj Totsche (Tárkony), atestis la lingvan maturecon kaj la stilan homogenecon, kiujn tiu skolo sukcesis atingi.

Malpli ambicia estis la verko de T. Indra *Norda Literaturo*, 1934, kun 4 latvaj kaj unu estona rakontoj. Samjare (1934) aperis la unua volumo de *Sveda Antologio* (1880-1910), redaktita de S. Jansson, B. Backmann, A. Lenner. La postan jaron (1935) aperis, en la ĉefredakto de Ota Ginz kaj S. Kamarýt, *Ĉeĥoslovaka Antologio*, dika verko atestanta la kulturan laboron, kiu tiel valorrezulte fervoris en Ĉeĥoslovakio. Iom pli modestas la verko *El Litova Poezio*, antologieca poemkolekto aperinta en 1938. En 1939 aperis *Svisa Antologio*, kiun ĉefredaktoris A. Baur, kun literatura enkonduko pri la kvar svisaj literaturoj: la alemana, la velŝa (romanda), la tiĉina kaj la retoromanĉa, kaj kun abunda, reprezenta, lingve eleganta prezento de reprezentaj elektitaj prozaj kaj poemaj verkoj.

7.3.4 La Tria Periodo

La Dua Mondmilito trafis profunde la Esperantan movadon, kaj la postmilitan tempon venenis longjare la Stalin-a malpermeso en multaj landoj. Tamen, la nivelo atingita antaŭmilite estis zorge konservita.

Jam dummilite, en Brazilo, Fr. Valdomiro Lorenz, unu el la plej malnovaj esperantistoj, kompilis *Diverskolora Bukedeto*, kun poemtradukaĵoj el 40 lingvoj (1941). La sama aŭtoro tradukis ankaŭ spiritismajn verkojn. El ili, unu, sub la titolo *Voĉoj de Poetoj el la Spirita Mondo* (1947), enhavas poemojn mediume diktitajn de pluraj mortintaj poetoj, i.a. de L. L. Zamenhof, Grabowski, St. Schulhof, kaj de nacilingvaj verkistoj.

En 1950 aperis traduko de Szilágyi: *Sveda Novelaro*, kun 20 noveloj de 16 aŭtoroj, lerte tradukitaj de ĉi tiu brila verkisto. En 1953 aperis *Aŭstria Antologio*, kaj, en la redakto de A. Caetano Coutinho, *Antologio de Brazilaj Rakontoj* (kun verkoj de 33 aŭtoroj), valora kontribuaĵo al la disvastigo de nemulte konataj literaturoj. En 1954, iel kompletigis verkojn antaŭmilitajn *Sveda Poemaro*,

kun verkoj de 29 poetoj, en redakto kaj senmakula traduko de la konata sveda poetino Magda Carlsson. En 1956 aperis traduko el antikvaj japanaj kaj ĉinaj poetoj: *El Orienta Florbedo,* redaktita kaj tradukita de la stilmatura Ossaka kenĵi.

Ankaŭ la nova Skota Skolo laboris sur la antologia kampo: ĝi pretigis la unuan volumon de *Angla Antologio* (1957), kun literaturscienca antaŭparolo de M. Boulton kaj sub la redaktoreco de W. Auld (por la poezio) kaj de R. Rossetti (por la prozo). La verko estas ekzemplo de la daŭra lingva pliriĉigo de Esperanto. En 1958 traduko de Ossaka kenĵi prezentis rimarkindan elekton el la japana klasika poemlibro de la 8-a jarcento p.K.: *505 Elektitaj Poemoj el Mannjoo-Ŝuu. Antologio de Portugalaj Rakontoj,* en redakto de Manuel de Seabra, aperis en 1959; *Ĉina Antologio 1949-1959,* do nur kun postrevoluciaj verkoj, en 1960 en traduko de Zee, Laŭlum, Honfan, k.a.

Dana Antologio, kun reprezentaj verkoj poeziaj (preskaŭ ĉiuj tradukitaj de P. Thorsen) kaj prozaj, estis eldonita en 1961. Trarigardon pri la modernaj japanaj verkistoj permesas *El Japana Literaturo 1868-1945,* en redakto kaj traduko de Miyamoto masao kaj Isiguro teruhiko, 1965, kun verkoj de 20 aŭtoroj. Alia antologio, sed kun japanaj klasikaĵoj, aperis samjare: *Japanaj Malnovaj Rakontoj,* kolektitaj de Yanagita kunio kaj kompil-tradukitaj de Miyamoto masao k.a. En 1968 aperis, post multjara silento, en traduko kaj redakto de E. Lippe kaj Milda Jakubcova, *Latva Poezio 1945-1966,* kun bone tradukitaj verkoj de 22 nuntempaj latvaj poetoj. Samjare venis el Japanio modesta, sed interesa libreto *Etudo '68,* kolekto de hajkoj tradukitaj el modernaj japanaj hajkistoj.

7.4 ESPERANTO KIEL FONTO-LINGVO

Sporade, sed konstante, aperas nacilingvaj tradukoj de Esperantaj originalaĵoj. Ĝis 1973 ekzistis en nacilingva traduko 64 originalaj Esperantaj volumoj, el kiuj 35 romanoj aŭ rakontoj, en 35 lingvojn, ĉefe orientajn. Plej ŝatata aŭtoro estis J. Baghy (9 verkoj tradukitaj), sekvata de J. Forge (ps. de Jan Fethke) (2 romanoj en 6 lingvojn). Rimarkindas la traduko de sciencaj verkoj: plej tradukitaj estas E. Aisberg, E. Privat, P. Neergaard, T. Sekelj kaj I. Lapenna.

Multaj tradukoj aperis dise ankaŭ en nacilingvaj revuoj.

7.4.1 Scienca Literaturo

De Zamenhof aperis *Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia* ĉine, japane, nederlande, portugale kaj serbokroate; *Lingvaj Respondoj* kaj *Paroladoj* japane.

E. Aisberg: *Mi Komprenas Fine la Radion!* aperis bulgare, ĉeĥe, estone, france, germane, greke, hebree, hungare, itale, latve, litove, portugale, rumane, ruse, slovene, angle, hispane, nederlande, norvege, pole, ĉine.

P. Neergaard: *La Vivo de la Plantoj* aperis dane, svede, finne, bulgare, pole, portugale, norvege kaj ĉine.

T. Sekelj: *Nepalo Malfermas la Pordon* aperis angle, hispane, serbokroate, slovene (alia verko de ĉi tiu aŭtoro, *Tra la Brazila Praarbaro* aperis pole).

E. Privat: *Vivo de Zamenhof* aperis angle, nederlande, japane, norvege kaj ĉine.

E. Drezen: *Zamenhof* kaj *Analiza Historio de Esperanto-Movado* aperis japane.

I. Lapenna: *Kultura Genocido kaj Homaj Rajtoj*, estis tradukita hispane, france, itale, germane, hungare, angle (tra la angla en la ĉinan).

E. Privat: *Historio de Esperanto* aperis japane kaj ĉine.

P. Bovet: *Psikanalizo kaj Edukado* aperis pole.

E. Adam (Lanti): *La Laborista Esperantismo* aperis angle, france, germane, ĉeĥe, nederlande kaj svede.

I. Lapenna: *La Homaj Rajtoj en la Universala Deklaracio kaj Eŭropa Konvencio* aperis en la itala kaj en la germana.

A. Fernández: *Senĝenaj Dialogoj* aperis france.

Atentinda estas la fakto, ke ĉiuj CED-dokumentoj aperas en la originala lingvo (Esperanto) kaj en angla traduko (kelkfoje ankaŭ en franca, hispana aŭ aliaj tradukoj).

7.4.2 Beletro

J. Baghy: *Hura!* (romano) aperis france kaj germane (tr. Mair 1933).

J. Baghy: *Printempo en la Aŭtuno* aperis france, hungare kaj ĉine (trad. Bakin, kiu siavice verkis „respondan" libron ĉinlingvan: *Aŭtuno en la Printempo*).

J. Baghy: *Viktimoj* (romano) aperis ĉine.

J. Baghy: *Nur Homo*, aperis ĉine.

Pluraj noveloj de J. Baghy aperis en la sveda, en la estona, en la finna kaj en la ĉina.

J. Forge: *Mr. Tot Aĉetas Mil Okulojn* aperis finne, germane, japane(?), pole, svede; *Abismoj* ĉine kaj finne.

E. Privat: *Aventuroj de Pioniro* aperis islande en la traduko de Kristofer Grimsson.

Vallienne: *Ĉu Li?* (romano) aperis en franca traduko.

Ellersiek: *Pro Kio?* (romaneto) aperis finne.

Eŭgeno Aisberg, kies popularscienca verko *Mi Komprenas Fine la Radion!* aperis en pli ol dudek naciaj lingvoj, surbaze de la originalo, verkita en la Internacia Lingvo en la jaroj 1925-26.





Inter la verkistoj de la Tria Periodo en naciajn lingvojn oni plej ofte tradukadis popularsciencajn verkojn de T.Sekelj kaj P.Neergaard.

Abesgus: *Kraljevič Marko* (rakonto) aperis ruse.

B. Benetka: *Sankta Venceslao* aperis litove.

Eroŝenko: liaj rakontoj (i.a. *Rakontoj de Velkinta Folio* kaj *Turo por Fali)* aperis ĉine, japane, ruse kaj ukrajne. Lian tutan verkaron kaj biografion entenas tri japanlingvaj volumoj, eldonitaj en 1959.

Hasegaŭa teru: *En Ĉinio Batalanta* kaj *Flustr' el Uragano* aperis japane.

Szilágyi: *Mistero Minora* aperis pole.

Cezaro Rossetti: *Kredu Min, Sinjorino!* (romano) aperis hungare.

Szathmári: *Vojaĝo al Kazohinio* (romano) aperis hungare.

Sayers: *Invito al Ĉielo* (romano) aperis finne.

Du romanoj de Bulthuis aperis hebree.

Ribillard: *Vivo kaj Opinioj de Majstro M'Saud* aperis estone (1968, tr. H. Sepamaa).

En la itala aperis la poemoj de L. L. Zamenhof, 1951, en traduko de A. Schmucker.

La romano de Egerrup, *D-ro Dorner,* aperis dane.

Goodall: *La Rakontoj de Sciuro,* aperis angle.

Miyamoto: *Pri Arto kaj Morto* aperis portugale.

Interesa estas la fakto, ke originala Esperanta verko povas aperi en nacilingva traduko, eĉ se la originalo restas neeldonita. Ekz. la verko de T. Sekelj *Kumeŭaŭa, la Filo de la Ĝangalo* aperis en la turka, en la ĉina kaj en ses hindaj lingvoj. El la rememoroj de Victor Lebrun, la lasta sekretario de L. Tolstoj, kies Esperanta originalo ĝis nun ne aperis, estis farita, pere de franca manuskripto, itala traduko. Du librojn, *La Sama Suno Lumigas la Mondon* kaj *Voĉo de l' Mondo* (ambaŭ 1949), Kurisu kei plenigis per japanlingvaj tradukoj de leteroj de siaj korespond-amikoj el 19 landoj.

7.4.3 Resume

El la originale esperantlingva verkaro aperis japane 17 volumoj, ĉine 16, france 9, svede 8, angle kaj pole po 7, finne kaj portugale po 5, germane, itale, nederlande, serbokroate po 4, dane, estone, hebree, hispane, hungare, litove po 3, bulgare, ĉeĥe, norvege, rumane, ruse, slovene po 2, greke, islande, latve, turke, ukrajne kaj en ses hindaj lingvoj po 1.

7.5 ESPERANTO KIEL PONTO-LINGVO

Ĝis 1969 aperis „pontolingve" pli ol 100 verkoj, tradukitaj el 26 lingvoj en 25 lingvojn.
Ĉinio profitis per ĉ. 50 tradukoj;
Japanio profitis per ĉ. 40 tradukoj;
Vjetnamo profitis per 2 tradukoj;
Mongolio profitis per 1 traduko.

Ni povas unuavide konstati, ke la slavaj lingvoj elstaras kiel donantoj, dum la ricevantoj estas ĉefe la ekstremorientaj landoj.

La Okcidento ricevis nur 8 verkojn (en 13 lingvojn), el kiuj 6 venis de Japanio, kaj 2 de Ĉinio.

Japanoj kaj Vjetnamanoj interŝanĝis tradukojn.

1/5 de la tuta verkaro ne konsistas el beletro, sed el politikaj, sciencaj verkoj, ktp. Ĉi tie ni emfazu, kiel diligente Japanoj kutimas traduki mallongajn literaturajn pecojn, ĉefe poemojn, el Esperanto en sian lingvon. Distingiĝis ĉi-kampe Kurisu kei, Matuba ki-kunobu, Miyamoto masao, Nakagaki kozirô, Nozima yasutarô kaj Sakai matutarô.

Ni deduktas la jenon:

1) La malpli konataj lingvoj diskonigas siajn verkojn pere de Esperanto.
2) Sed koncerne la fakton, ke plejmulte profitis la orientanoj, ni povas demandi nin, ĉu la orientanoj pli multe interesiĝas pri okcidentaj literaturoj, ol la okcidentanoj pri orientaj.
3) Aŭ eble mankas en oriento kompetentaj tradukistoj, kiuj bone scipovas la okcidentajn lingvojn (pro tio oni tradukas tra la Esperanta).
4) Aŭ eble mankas en Okcidento talentaj el-Esperantaj tradukistoj (aŭ ekzistas sufiĉe da tradukistoj, kiuj scipovas la orientajn lingvojn).

Kiel ajn, valoras la penon pritrakti iom detale tiun kulturan interŝanĝon, kiun ebligas Esperanto, almenaŭ koncerne ĝiajn plej gravajn produktaĵojn.

El la Oriento

a) *El la japana:*

„Japanaj Rakontoj", kompilitaj de Ĉif toŝio, en la rusan (jam en 1913). „Danco de Skeletoj" kaj „Nokto ĉe Landlimo", dramoj de Akita uĵaku, en la ĉinan.

„Kun la Kadavro de l'Edzino" de Ogura toyofumi, en la germanan, litovan, polan, bulgaran, hungaran kaj vjetnaman.
„Ni ne Povas Silenti!" en la germanan.
„La Belan Pacon" (Yamaguti senzi) en la anglan kaj germanan.
„Infanoj de l'Atombombo" aperis ukrajne, svede, germane, ĉeĥe.

b) *El la vjetnama:*
„Senelirejo", en la japanan.
„Meze de l'Flamoj", en la japanan.
„Franjo Tu Haŭ", en la japanan.
„La Lasta Altaĵo", en la japanan.

c) *El la ĉina:*
„Mi volis Viziti Lernejon", en la italan kaj germanan.
„Karpetoj Transsaltis la Drakpordon", en la litovan.

El la Okcidento

a) *El la slavaj lingvoj*

El la rusa:
en la ĉinan: poemoj de Majakovskij;
„Eŭgeno Onegin", „La Kapitanfilino" de Puŝkin;
verkoj de Gogol, L. kaj A. Tolstoj, Mamin-Sibirjak, Gorkij, Radek.
en la japanan: „Kie Estas Amo, Tie Estas Dio" de L. Tolstoj, „Versaĵoj en Prozo" de Turgenev, „La Submarinistoj" de Novikov-Priboj, „Historio de la Mondolingvo" de Drezen.

El la ukrajna:
en la ĉinan: „La Morto de Janulans" de Panĉ.

El la jugoslaviaj:
en la ĉinan: verkoj de Pogačić, Šimunović.
en la islandan: „Tragedio en la Universo".

El la bulgara:
en la ĉinan: poemoj, rakontoj, noveloj de Geo Milev, Ĥristo Botev, Iv. Vazov, Stamatov, Elin-Pelin, Konstantinov, Smirnenski, k.a.
en la japanan: G. Stamatov.

El la ĉeĥoslovakaj:
en la ĉinan: novelaro de J. Drda, poemoj de Sv. Čech, M. Pujmanová, P. Bezruč, noveloj kaj poemoj el „Ĉeĥoslovaka Antologio".
en la japanan: verkoj de Božena Němcová, Langer, Bezruč, Neruda, Dyk, Drda, Welzl.
en la finnan: kontribuaĵoj al ĉeĥoslovaka numero de la finna kultura revuo *Otavainen* (1925).

en la hispanan: poemo de A. Recka.
en la maltan: poemo de Bezruč.

El la pola:
en la japanan: „Marta" de E. Orzeszko, ankaŭ filmigita; rakontoj de W. Reymont, W. Sieroszewski, H. Sienkiewicz.
en la ĉinan: „Marta", verkoj de Sienkiewicz („Quo Vadis?"), Sieroszewski, Korczak, Prus („La Faraono").
en la vjetnaman: Mickiewicz: „Pan Tadeusz" (Sinjoro Tadeo).
en la francan: „Doktoro Esperanto" de M. Ziółkowska.

b) *El la latinidaj lingvoj*

El la franca:
en la ĉinan: „La Sonorilo" de J. Lemaitre.
en la japanan: „Mateo Falcone" de P. Mérimée, „Angla Lingvo sen Profesoro" de T. Bernard.

El la rumana:
en la nederlandan: 2 noveloj de Sadoveanu kaj Brătescu-Voineşti (por novelkolekto).
en la ĉinan: novelo de Brătescu-Voineşti.

El la itala:
en la ĉinan: noveloj de De Amicis.

El la hispana:
en la ĉinan: „Sango kaj Sablo" de Vicente Blasco-Ibáñez.

c) *El la ĝermanaj lingvoj*

El la germana:
en la ĉinan: novelo de Th. Storm, du fabeloj de Grimm.
en la italan: psikologia verko de M. Kojc.
en la japanan: poemoj de Heine, fabeloj de Grimm kaj Seidel.

El la jida:
en la ĉinan kaj en la japanan: verkoj de Ŝalom-Aleĥem.

El la dana:
en la anglan: traktaĵoj de Martinus.
en la mongolan: fabeloj de Andersen.

El la norvega:
en la slovakan: „Kon Tiki" de Heyerdahl.
en la ĉeĥan: „Per Aerŝipo al la Norda Poluso" de O. Arnesen.

El la nederlanda:
la teatraĵo de M. Dekker „La Mondo ne Havas Atendejon" aperis japane, ĉine, ĉeĥe kaj france.

La verketo de Luiscius „Karaktero" aperis en la finna, en la ĉeĥa, en la franca, en la kataluna kaj en la itala.

El la islanda:
en la ĉeĥan: malnovaj islandaj sagaoj.

El la sveda:
en la japanan: „Tra sovaĝa Kamĉatko" de St. Bergman.

ĉ) *El aliaj lingvoj*

El la hungara:
en la ĉinan: verkoj de Heltai, Jókai, Mikszáth, noveloj de Herczeg, „Johano la Brava" de Petöfi.

El la estona:
en la ĉinan: elektitaj poemoj.
en la japanan: poemo de Marie Under en traduko de Matuba (1963), „la unua estona poemo en japana vesto".

7.6 ESENCA BIBLIOGRAFIO

Auld, William, *Pri la traduko de poezio* (CED-Dok. D/I/4). Londono 1965.
Boulton, Marjorie, *Zamenhof.* La Laguna 1962.
Courtinat, Léon, *Historio de Esperanto,* vol. 1 (1964), vol. 2 (1965), vol. 3 (1966). Bellerive-sur-Allier.
Haupenthal, Reinhard, *Enkonduko en la librosciencon de Esperanto.* Nürnberg 1968.
Lapenna, Ivo (red.), *La Internacia Lingvo (Faktoj pri Esperanto).* Londono 1954.
Marini, Bruno, *Bibliografia essenziale della lingua internazionale Esperanto.* Torino 1954.
Mounin, Georges, *Teoria e storiă della traduzione.* Torino 1965.
Privat, Edmond, *Esprimo de sentoj en Esperanto.* 3-a eld. Hago 1957.

ĈAPITRO 8

SCIENCA, POPULARSCIENCA KAJ FAKA LITERATURO

8.1 ESPERANTO KAJ SCIENCO

8.1.1 La Lingva Problemo en la Scienco

Kun la definitiva malapero de la latina kiel komuna scienca lingvo, iom post iom enkondukiĝis la uzo de la naciaj lingvoj por la popularigo kaj la traktado de sciencaj problemoj kaj rezultoj.

Ekzistas ŝtatoj, kiuj estas tiel grandaj, kaj kies ekonomio estas tiel forta kaj tiel riĉa, ke ili permesas vastan sciencan esploron, la aperigon de valoraj verkoj en granda nombro kaj la rapidan tradukon de fremdlingvaj studoj. Tial kreiĝis la fenomeno de la „gravaj" lingvoj por la scienco, kia siatempe estis la franca, kaj kia hodiaŭ estas la angla.

Tamen, depende de la politika, ekonomia, geografia, kaj eĉ „prestiĝa" situacio, elstaras pluraj aliaj „gravaj" sciencaj lingvoj.

En medicino, ekzemple, proksimume la duono de la tuta literaturo aperas anglalingve: la ceteraj kontribuaĵoj, ofte rimarkinde valoraj, aperas ruse, france, germane, japane (kaj en aliaj lingvoj malpli uzataj). Pro tio kuracisto, kiu hejme parolas „malgrandan" lingvon, devas nepre scii almenaŭ unu el la grandaj, por ke li povu sekvi la aperon de la novaj eltrovoj. Sed se li volas fari esplorojn pri iu ajn medicina branĉo, li nepre devas scii 3-4 fremdajn lingvojn, se li ne volas preteratenti en sia laboro gravajn kontribuaĵojn.

La fakto, ke la plejmulto de la sciencistoj scias tamen nur sian propran lingvon, aŭ maksimume unu fremdan (tiuj, kiuj scias du aŭ

pli, estas talentaj esceptoj), senteble malhelpas la cirkuladon kaj pro tio la efikon de la scienca informado: ĝi disvastiĝas nur iom post iom per tradukoj, per malrapida legado, kun la vortaro en la mano, (ofte miskompreniga!) aŭ tra absolute nesufiĉaj resumoj.

Profundiĝi en la studon de la propra sciencobranĉo kaj samtempe lerni 5-6 lingvojn kapablas nur malgranda elito de lingvotalentaj sciencistoj: tio prezentas ĉiuokaze tamen rimarkindan malŝparon de tempo kaj forto.

Tiu malavantaĝa situacio brile evidentiĝas dum sciencaj kongresoj, kie plej senĝene povas esprimiĝi nur tiuj, kies hejmlingvo estas unu el la oficialaj lingvoj. La multekostaj traduksistemoj (samtempa, resuma, postprelega) ne helpas: ili bremsas la naturan rapidon de la parolo kaj la efikon de la lingve senperaj diskutoj, kaj ne utilas al tiuj, kies hejmlingvo ne estas unu el la oficialaj idiomoj.

8.1.2 Valoro de Esperanto por la Scienco

Jam en 1889 la fama ĝeneva filozofo Ernest Naville submetis al la Franca Akademio de Sciencoj komunikon pri la signifo de internacia lingvo.

En 1901 la spertulo pri balistiko, Generalo Sebert, membro de la Franca Akademio de Sciencoj, prezentis al ĝi propran komunikon *Scienca Utileco de Internacia Helplingvo.* Samtempe li iniciatis leteron, favorantan Esperanton, por la Internacia Asocio de Akademioj, kiu ricevis 20 subskribojn. Ĝi invitis la Internacian Asocion de Akademioj entrepreni la studon por la solvo de la internacilingva problemo.

Tuj poste Ch. Méray, korespondanta membro de la Franca Akademio de Sciencoj, sendis al ĝi leteron, kiu raportis pri la servoj, kiujn povas havigi al la scienco la internacia lingvo de D-ro Zamenhof.

Intertempe la Esperanto-Movado kreske organiziĝis, kaj la bezonon krei propran organizaĵon sentis ankaŭ la esperantoparolantaj sciencistoj. Dum la UK en Ĝenevo (1906) okazis kunsido de Esperantaj sciencistoj. Ĝin prezidis Generalo Sebert kaj ĝin sekretariis Prof. Carlo Bourlet. Oni decidis subteni la enkondukon de Esperanto en la sciencon kaj la eldonon de *Scienca Revuo* (kiu aperis ĉe Hachette jam ekde 1903 sub la redakto de P. Fruictier).

Fine, en 1908 estis fondita ISAE: ĝia oficiala organo iĝis *Scienca Revuo.* La celo de ISAE estis agadi en sciencaj medioj por Esperanto, kaj riĉigi la Esperantan sciencan terminologion. Fakte, unu el ĝiaj unuaj eldonaĵoj estis *Vocabulaire Technique et Technologique Français Esperanto* de Ch. Verax.

8.1 ESPERANTO KAJ SCIENCO

Post la Unua Mondmilito la disvastiĝo de Esperanto en la sciencaj medioj fariĝis atentinda. Jam en 1924 oni diskutis pri la internacilingva problemo en la Franca Akademio de Sciencoj. La rezulto estis rezolucio, subskribita de 40 membroj, i.a. de E. Borel, A. Cotton kaj Sebert (mem esperantistoj), en kiu estis akcentita la konvinko, ke la Internacia Lingvo, praktike akceptita en la internaciaj rilatoj, „havus grandegajn konsekvencojn el la vidpunkto de la progreso de la scienco kaj de ĝia aplikado". Tial la subskribintoj esprimis la deziron, ke tiu ĉi lingvo — „majstroverko de logikeco kaj simpleco", estu enkondukita en la oficialajn programojn de la sciencaj klasoj, almenaŭ kiel nedeviga objekto.

En 1937 okazis en Parizo granda konferenco „Esperanto en la Moderna Vivo". Sekcio, prezidata de Prof. A. Cotton, tiama prezidanto de la Franca Akademio de Sciencoj, okupiĝis pri la rolo de Esperanto en la scienco, kaj montriĝis favora al la enkonduko de Lingvo Internacia, kaj aparte de Esperanto.

En 1938 atentinda rezulto estis la enkonduko de Esperanto kiel radiko-normiga lingvo en la laboroj de Internacia Elektroteknika Terminologia Centro: tio, tamen, postmilite, ne plu havis sekvojn.

En 1950 la Japana Scienca Konsilantaro akceptis rezolucion, en kiu oni skribis i.a. ke „la sciencistoj deziras, ke iliaj studoj estu konataj egale en ĉiuj partoj de la mondo, kaj, same tiel, ke la studoj faritaj en ĉiuj partoj de la mondo estu konigataj al ili. Sen tio ni ne povas atendi veran evoluon de la scienco".

Samjare 85 japanaj sciencistoj (el kiuj 68 estis universitataj profesoroj) subskribis specialan promeson, laŭ kiu ili devigas sin publikigi en Esperanto almenaŭ unu el la disertacioj, kiujn ili verkos en ĉiu jaro, kaj aldoni esperantlingvan resumon al ĉiu traktato verkata en alia lingvo. En la „promeso" la subskribintoj akcentas:

> La sciencaj esploroj devas ne esti izolitaj al unuopaj landoj kaj iliaj rezultatoj devas ne esti akaparitaj de unuj laboratorioj aŭ individuaj esplorantoj. Scienco estas komuna klopodo de la homoj por fari sin estuloj vere meritaj de la nomo „homo sapiens".... La subskribintoj agnoskas, ke la enkonduko de Esperanto kiel komuna lingvo por internacia publikigo de sciencaj laboroj estas tre efika rimedo por plisolidarigo de la internacia kunlaboro de la sciencistoj.

Pri la ĝisnunaj spertoj de la japanaj sciencistoj, kiuj publikigis siajn verkojn en Esperanto, la dokumento diras:

> Kelkaj el ni jam delonge tion.... praktikas; kaj kvankam niaj verkoj en Esperanto estis publikigitaj nur individue kaj hazarde, tamen eĥoj el eksterlando ne estis malgrandaj. Estas antaŭvideble, ke ni vekos multe pli grandan eĥon, se ni agos sisteme kaj kolektive. Al la eŭropaj

kaj amerikaj sciencistoj estas preskaŭ nebezone speciale lerni Esperanton por legi Esperantajn traktatojn.... Ni estas certaj, ke niajn ekzemplojn baldaŭ sekvos alilandaj kolegoj, kaj tio malfermos la vojon al plifaciligo de la internacia kunlaborado de la sciencistoj.

En 1951 analogan rezolucion prenis ankaŭ 20 ĉinaj universitataj profesoroj. I.a. ili skribas, ke „la sciencistoj, kiuj malfeliĉe parolas aliajn lingvojn kaj kiuj deziras tamen ion krei en siaj propraj sferoj, devas eluzi pli ol duonon de sia vivtempo por ellerni 4 aŭ 5 fremdajn lingvojn, ĉar alie ili ne povas digesti la konojn jam ekzistantajn, des malpli fari ian indan kontribuon. Tia tro-konsumo de tempo kaj energio estas vere nekompensebla perdego de la scienco. Ni volas adopti la simplan, facile lerneblan Lingvon Internacian, Esperanto, kiel la sciencan lingvon por internacia uzado kaj por publikigi niajn verkojn en ĝi."

Ankaŭ en Eŭropo sciencistoj-esperantistoj kunvenis en du gravaj konferencoj, en Parizo (1950) kaj en Munkeno (1951), por esplori la teknikan flankon kaj la spiritan-moralan aspekton de la lingva problemo en la scienco. Tiuj konferencoj, kiujn partoprenis pli ol 100 sciencistoj el diversaj landoj, akceptis plurajn decidojn koncerne la pluan utiligon de Esperanto por sciencaj celoj. En la alvoko de la munkena konferenco estas, i.a., dirite, ke „ni povas konstati, verkante mem en tiu lingvo, ĝian plenan taŭgecon tute aparte por sciencaj celoj..... Ni opinias, ke la Internacia Lingvo, pruvita praktike en sia pli ol 60-jara ekzistado, meritas seriozan konsideron fare de la scienco".

En 1952 analoga rezolucio estis voĉdonita dum sciencista kunveno en Oslo.

En 1962 okazis en Kopenhago la unua Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco, por kiu estis prezentitaj 25 raportoj kaj unu rezolucio (de la Geografia Instituto de la Akademio de Scienco de Sovetunio). La raportoj kaj la konkludoj estis favoraj al internacia lingvo, kaj aparte al Esperanto.

Intertempe ISAE pliampleksigis sian agadon, kaj artikigis ĝin laŭ faksekcioj. En 1950 formiĝas Terminologia Centro, kiun la Akademio komisias ellabori provizorajn fakvortarojn por la ĉiam pli rapide evoluantaj tekniko kaj scienco. La medicina sekcio, UMEA, havas propran Terminologian Centron.

8.2 ESPERANTO KIEL RESUMLINGVO EN SCIENCAJ ELDONAĴOJ

Ekde 1887 proksimume 205 periodaĵoj (fakaj kaj sciencaj) aperigis artikolojn aŭ resumojn de artikoloj en Esperanto. En la lastaj dudek

jaroj ili estis pli ol 86. La geografia distribuo de la periodaĵoj estas la jena:

El Japanio venis 49 periodaĵoj,
el Nederlando venis 12 periodaĵoj,
el Jugoslavio venis 5 periodaĵoj,
el Francio venis 3 periodaĵoj,
el Tajvano, Danio, Norvegio, Finnlando, po 2 periodaĵoj,
el Usono, Brazilo, Italio, Germanio, Portugalio, Alĝerio, Maroko, po 1 periodaĵo.

La faka konsisto de tiuj periodaĵoj estas la jena:

Botaniko kaj zoologio:
12 revuoj (Svedio, Norvegio, Francio, Nederlando, Japanio).

Medicino kaj farmakologio:
11 revuoj (Francio kaj Japanio).

Geofiziko, geologio, sismologio:
6 revuoj (Usono, Finnlando, Jugoslavio, Japanio).

Fiziko kaj kemio:
8 revuoj (Japanio kaj Nederlando).

Matematiko:
4 revuoj (Italio, Portugalio, Germanio, Japanio).

Astronomio:
2 revuoj (Finnlando, Japanio).

Agrokultivo kaj agronomio:
9 revuoj (Danio, Svedio, Francio, Nederlando, Japanio).

Preterlasante la fakton, ke ĉi tiuj informoj ne estas kompletaj, ili demonstras, ke la bezono por scienca helplingvo (Esperanto) estas multe pli sentata en landoj, kies lingvo ne estas grandskale uzata.

El la multaj revuoj fakaj kaj sciencaj, kiuj aperigas resumojn en Esperanto, la ĉefaj estas *La Monda Lingvo-Problemo* (sociolingvistiko), *Journal de Médecine de Lyon* (medicino), *Medicamundi* (pri radiologio kaj medicina elektroniko), *Puig Castellan* (kataluna historia bulteno), *Der Chemischreiniger und Färber* (pri kemia lavado kaj farbado), k.a.

Ni diris, ke multaj sciencistoj publikigis verkojn aŭ artikolojn en ekstermovadaj fakgazetoj — en Esperanto aŭ nacilingve kun Esperanta resumo. Prof. D-ro B. Popović (astronomio), ekz., aperigis 29 sciencajn kontribuaĵojn, el kiuj 13 en Esperanto. Multajn studojn kaj artikolojn verkis ankaŭ Prof. Ivo Lapenna (internacia juro), Marinko Gjivoje (arkeologio, historio, speleologio), Prof. O. Pancer (agronomio),

Leander Tell (speleologio), P. Makkink (botaniko), Prof. P. Neergaard (botaniko) kaj Prof. Kawamura sin'itirô (agrokemio).

El esperantlingvaj doktoriĝaj disertacioj ni notu tiun de la Hindo Aŝvinikumar' (Universitato de Amsterdam), *Hilbertaj Spacoj en Intuiciismo*, 1966 (kun angla traduko pro la universitata regularo), kaj la disertacion de la Japano Tada ryuji (Universitato de Kagawa), *Studoj pri Ŝanĝo de Oligosakaridoj Ekstraktitaj el Sengrasigita Sojo per la Bakterio Escherichia Coli*, 1967.

Menciindaj estas ankaŭ nacilingvaj doktoriĝaj tezoj sur la kampo de esperantologio, i.a. *El Problema de una Lengua Auxiliar Internacional y Solución: El Esperanto* de Elías J. Johns, en la hispana (Kubo), 1928; *Vijf Kunsttalen* de W. J. A. Manders, en la nederlanda, 1947; *The Esperanto Language as a Literary Medium* de Margaret Hagler, en la angla (Usono), 1971.

8.3 VERKOJ LAŬ FAKOJ

8.3.1 Filozofio

En 1902 (2-a eld. 1904) aperis la verko de Leibniz *Monadologio* (tr. Boirac). En 1904 aperis la verko de la Franco Xavier de Maistre *Vojaĝo Interne de Mia Ĉambro* (tr. S. Meyer). En 1906 oni eldonis la faman traktaĵon de Descartes (Cartesius) *Parolado pri la Metodo* (tr. E. Noël). K. Aars verkis *Eco de la Logika Pensado* (1907). En 1908 aperis alia originalaĵo filozofia: la verko de la Litovo Dambrauskas (Dombrovski) *Malgrandaj Pensoj pri Grandaj Demandoj. Teorio pri la Evolucio de Kono* estas originalaĵo de N. Kolowrat (1909). De la ĝeneva filozofo E. Naville aperis *La Devo* (tr. R. de Saussure), 1910. La postan jaron aperis de L. Tolstoj *La Konfeso* (tr. Tenner). En 1912 aperis alia filozofia verko de Tolstoj: *Unua Ŝtupo* (tr. A. Ŝarapova). La originalaĵo de Salo Kornfeld (ps. Grenkamp) *Penseroj* aperis duvolume 1922-1923. En 1924 aperis la verko de Kant *Al Eterna Paco* (tr. P. Christaller). Filozofi-lirikajn fragmentojn publikigis originale E. Izgur en 1926: *Je l'Nomo de l'Vivo*. La dika verko de la urugvaja filozofo Carlos Vaz-Ferreira, *Fermentario* (tr. M. Fernández-Menéndez) aperis en 1959. En 1961 aperis libro de B. C. Chaudhuri *Pri du Filozofoj* (Tagore kaj Whitman). En 1963 aperis religi-filozofia verko de la Brazilano Huberto Rohden, *Imperativoj de la Vivo*. En 1972 aperis la grava verko de Maŭ zedong *Kvin Filozofiaj Verkoj*.

Pri *sciencfilozofio* aperis la verko de F. Reiche *El la Mondbildo de l'Nova Fiziko* (tr. Muravkin), 1924, la verko de la Ruso A. Fers-

man *La Vojo al Scienco de Estonto* (tr. S. Rublov), 1928, kaj la libro de Jean Rostand *Tio, Kion Mi Kredas* (tr. Berlot), 1962.

Abundas la rikolto el *moralfilozofiaj* verkoj. Jam en 1912 aperis la verko *Estu Homo!* de Charles Wagner (tr. S. Meyer). La postan jaron la Hispano Julio Mangada-Rosenörn prezentis originalan verkon *Homaro*. Ne forgesendaj estas la religi-etikaj verkoj de L. L. Zamenhof pri *Hilelismo* (1901) kaj *Homaranismo* (1906), kaj la *Deklaracio pri Homaranismo* (1913). En 1922 aperis en Italio du moralfilozofiaj verkoj: *Pri la Devoj de l'Homoj* de Silvio Pellico (tr. A. Tellini) kaj *Devoj de la Homo* de Giuseppe Mazzini (tr. M. Arabeno). En 1950 estis publikigita la moraltema verko de Enrique Rodó (Urugvajano) *Ariel* (tr. F. Fernández-Menéndez). Interesa traktato de delonge mortinta katolika teologo (Hirsch) estas *Sintrompoj* (tr. Flammer), 1963. Pri seksmoralaj problemoj traktas la leterforma libro de W. Trobisch (protestanta teologo) *Mi Amis Junulinon*, 1966, elfrancigita de pastoro Burkhardt. La ĝenerala-filozofia verko de J. M. Escrivá-de-Balaguer (tr. N. López-Escartin), *Vojo*, aperis en 1968.

Ekzistas verkoj ankaŭ de *modernaj orientaj pensuloj*. De J. Krishnamurti aperis la verko *Ĉe la Piedoj de la Majstro* (tr. W. Mann), 1913 (2-a eld. 1928). De la sama hinda filozofo aperis *Sperto kaj Konduto* (tr. Stojan), 1932, kaj *La Problemoj de la Vivo* (tr. K. Fröding), 1935. Pri la japana filozofia penso aperis la verko de Akegarasu haya *La Japana Spirito*, 1936. De Kahlil Gibran, arab-devena lirik-mistika filozofo, aperis *La Profeto* (tr. R. Orloff-Stone), 1962.

Depost la fino de la milito aperas en Danio lingve bonaj verkoj de la dana religi-fona filozofo (forte influata de la orienta saĝo) *Martinus*. Liaj plej gravaj verkoj estas *Homaro kaj Mondbildo* (tr. C. Graversen), 1953, *Pasko* (tr. C. Graversen), 1954, *Internacia Mondregno Kreiĝanta* (tr. P. Zacho), 1962, *Logiko* (tr. Ib Schleicher), 1962, *La Sorto de la Homaro* (tr. Ib Schleicher), 1964.

8.3.2 Teologio kaj Religio

Pri religio ni disponas pri kelkaj pure sciencaj verkoj, kiel la *Hebrea Kalendaro* de J. Bianchini, 1907; Henri Vallienne, *Evolucio de la Religia Ideo*, 1907; *La Difino de la Dattago en la Kristana Epoko* de Fleischer, 1914; Karl Brüggemann, *El la Mitologio de Antikvaj Popoloj*, 1923; Kling-Klang (pseŭdonimo de Z. Marenĉin), *Latentaj Nombrofenomenoj en la Sankta Skribo*, 1962. Ĉiuj cititaj verkoj estas originalaj. Aparte interesa estas la kritika studo de

D. B. Gregor, *La Esperanta Traduko de la Malnova Testamento,* kiu aperis en 1958.

Ĝeneralaj verkoj pri Dio kaj religio estas *Dio Unu por Ĉiuj* (tr. Anna Ŝarapova), 1912, kaj *Kristanismo kaj Patriotismo* (tr. I. Maĉernis), 1931, ambaŭ de Lev Tolstoj. De Monsinjoro de Ségur aperis *Respondoj al Kontraŭreligiaj Paroloj* (tr. A. Halbedl), 1925. En 1927 la katolika pensulo J. Reinke aperigis en esperantlingva traduko de E. Brenken la verkon *Naturscienco, Mondkoncepto, Religio.* Alia katolika pensulo, Josef Schmidt, prezentis la verkon *La Origino de la Religio,* 1927. Pli malfrue, en 1965, aperis la religi-favora libro de Gustav Lundberg *Kredo al Dio en la Atomepoko* (tr. E. Carlén). Interesan interreligian verkon eldonis Oomoto en 1969: *La Hombildo de Diversaj Religioj.*

Religi-esplora verko estas *La Vivo de Jesuo* de E. Renan (tr. E. Gasse), 1907. En 1914 aperis verketo de W. Winsch *Pri la Kredo al Mirakloj* (tr. P. William), kun provo de natura klarigo de la bibliaj mirakloj. En 1912 aperis la verko de Barrio-y-Moraita *Kritika Ekzameno de la Proceso kontraŭ Kristo* (tr. J. Garzón-Ruiz). En 1965 aperis la originala verketo de E. Gasse *Monoteismo kaj Pozitiva Moralo.*

El la socialista-komunista tendaro ne povis manki kontraŭreligiaj verkoj. SAT aperigis en 1925 *Kontraŭ Dio!* (ateista krestomatio). En 1930 aperis pamfleto de N. Buĥarin *Financa Kapitalo en la Papa Mantelo.* Alia pamfleto, de la germana anarkisto Johann Most, aperis en 1932: *La Dia Pesto* (tr. Seman Tarano). Samjare E. Jaroslavskij aperigis *Respondoj al Ekstersovetiaj Ateistoj,* kaj L. Kapustin tradukis la verkon de M. Ŝejnman *Nuntempa Socialdemokratio, Religio kaj Ateismo.* Fine, en 1933, A. T. Lukaĉevskij aperigis la verkon *Marks kaj Engels pri Religio.*

8.3.3 Religia Literaturo

Baza verko por la studo de la religia literaturo en Esperanto estas *Religia Literaturo en Esperanto* (bibliografio), de Karl-Olof Sandgren, 1970.

La baza verko de la kristana kaj juda religioj, *La Malnova Testamento,* tradukita de L.L. Zamenhof inter 1907 kaj lia morto, reviziita de komitato de anglikanaj pastoroj, aperis en 1926. *La Nova Testamento,* tradukita el la helena originalo de anglikana komitato sub la gvido de pastoro Rust, aperis en 1912.

Jam en 1893 estis traduko de la *Libro de Ruth.* Plej modernaj tradukprovoj aperis en *Espero Katolika* kaj en *Biblia Revuo* (ekde 1969 provoj de Donald Broadribb por traduko taŭga por bibliistoj

kaj orientalistoj). Kelkaj kajeroj de la katolika novtestamenta traduko jam aperis: 3 kajeroj kun enkonduko, Evangelio laŭ Mateo kaj la du leteroj al la Korintanoj. Ne mankas unu el la tradiciaj reellaboroj por religiaj celoj, tamen sen scienca valoro: *La 4 Evangelioj Kunigitaj en Unu Rakonto,* de R. Laisney, 1908.

El la dogma literaturo interesaj estas *La Hipotezoj pri Lourdes,* de J. Serre (tr. Zabilon-d'Her), 1912, *La Unua Kateñismo* de Bossuet (tr. P. Deschamps), 1912, la verko de la katoliko P. van Dorp *Biblio aŭ Instru-Aŭtoritato,* 1946. Originalan katekismon verkis ankaŭ J. Bianchini: *Malgranda Katolika Kateñismo,* 1937 kaj 1949. Interesa estas la verko de J. Tanuma-Tosio *La Origino de l'Protestantismo* (el la katolika vidpunkto), 1938. De pluraj jaroj aktivas sur la eldona kampo Internacia Katolika Informejo, kun du libroserioj: *Dokumentoj el Romo,* kaj *Serio Studoj kaj Klarigoj.* Sennombraj estas la katolikaj prisanktulaj kaj instrucelaj verketoj kaj broŝuroj. En 1920 estis publikigita la parolado de Papo Benedikto XV, *Kristo kaj la Ligo de Nacioj;* en 1926, de Papo Pio XI, *La Universala Reĝeco de Kristo* (tr. J. Schmidt); en 1963 la encikliko de Papo Johano XXIII *La Surtera Paco;* kaj en 1965 la encikliko de Papo Paŭlo VI *La Vojoj de la Eklezio* (tr. Perrenoud kaj Flammer). Aperis krome multaj protestantaj kaj katolikaj bibliokursoj, kaj la traduko de la *Lutera Katekismo* (tr. R. Hoppe), 1961. En 1967 aperis la encikliko de Paŭlo VI *Populorum Progressio* (tr. J. A. Tuinder), samjare ankaŭ la konata *Heidelberga Katekismo* (tr. W. J. Downes), de Ursinus kaj Olevianus. Fine, en 1971, en la serio Dokumentoj el Romo, aperis *Dogma Konstitucio pri la Eklezio en la Nuntempa Mondo.*

Aperis ankaŭ interesaj verkoj de la kristana mistika literaturo. En 1907 aperis *La Progresado de la Pilgrimanto* de J. Bunyan (tr. J. Rhodes); en 1926 la valora *La Floretoj de Sankta Francisko* (tr. F. Pizzi), ekzemplo de la populara mezepoka naiva mistikismo; en 1952 *Spiritaj Ekzercadoj* de Ignacio de Loyola (tr. E. Maynar), fondinto de la jezuita ordeno. En 1954 oni eldonis plenan tradukon de *La Imitado de Kristo* de Th. a Kempis (tr. Wigbertus van Zon). Unua provo traduki tiun verkon estis farita de Champion en 1909.

Propagandaj, klarigaj, instigaj kaj instruaj broŝuretoj kaj verketoj estis eldonitaj de multege da kristanaj eklezioj kaj grupoj: i.a. de katolikoj, kalvinanoj, luteranoj, anglikanoj, mariavitanoj, unitaristoj, kvakeroj, liberekleziuloj, ktp. Jen malgranda, kaj ege malkompleta elekto.

La „Blanka Frataro", religia grupo estiĝinta en Bulgario, eldonis inter 1925 kaj 1938 plurajn religi-etikajn verketojn de la fondinto, P. Danov. Plej interesaj kaj signifaj estas *Religio-Filozofia Viv-*

koncepto (tr. A. Tomov), 1930, kaj *La Parolo de la Granda Universala Frataro,* 1938

De la Swedenborg-a eklezio aperis kelkaj verketoj: *La Dogmaro,* de Swedenborg, 1908, *Kio la Homo Estas post la Morto,* 1911, kaj kelkaj aliaj verketoj. De unu el la fondintoj de la atestantoj de Jehovo, J. F. Rutherford, aperis *Milionoj, Kiuj nun Vivas, Neniam Mortos,* 1920, kaj *Kie Estas la Mortintoj?,* 1927. Fine, ankaŭ la kvakeroj multe eldonis en Esperanto. Plej interesaj estas: *Fundamentoj de la Kvakerismo* de Caroline Stephen (tr. M. C. Butler), 1916, kaj *La Esenco de la Kvakerismo* de Gerald K. Hibbert (tr. M. Wajsblum), 1962.

Aperis multaj preĝaroj, evangelie edifaj libroj, kantaroj, diservolibroj. La unua tiaspeca verko estis *Preĝareto por Katolikoj* de L. de Beaufront, 1893. Sed plej konata estas *La Preĝareto,* de M. Carolfi, 1913 (3-a eld. 1948). Aperis ankaŭ preĝlibro en la spirito de la liturgio de S-ta Ĥrisostomo (1962): *Neelmezurebla Ni Laŭdegas Vin. Ordo de Diservo* laŭ la preĝlibro de la anglikana eklezio (tr. J. C. Rust) aperis en 1907, kaj havis multajn posteulojn. Broŝureto por sekvi la katolikan meson (*Sankta Meso)* aperis en 1966 kun originala muziko de Kurt Schweizer; sed jam antaŭe ekzistis aliaj. Ekde 1968 plej granda parto de la katolika meso estas legebla en Esperanto.

Signo de la novaj tempoj estas *Ekumenaj Preĝoj,* 1966.

Ekzistas ankaŭ himnaroj: katolika himnaro tradukita de Felix Ney aperis en 1958: *Laŭdkanto al Sinjora Nom'.* Evangeliaj himnaroj estas *Himnaro Esperanta,* kunmetita de Montagu C. Butler (5-a eld. 1966) kaj *Adoru Kantante* (de KELI), 1971.

Ankaŭ pri la islama religio aperis verkoj. En 1967 aperis la filozofi-religiaj maksimoj de Imamo Ali *Arabaj Maksimoj* (tr. Husen Al-Amili). Sed la plej grava verko estas la dulingva (araba-Esperanto) eldono de *La Nobla Korano* de Muhamad, en traduko de Prof. D-ro Italo Chiussi, 1969. Antaŭaj provoj traduki la islaman sanktan libron estis faritaj de Colin Evans (en *Esperanto Internacia),* 1942. Krome, estas kelkaj informaj broŝuroj: i.a. *Islamo Ĉies Religio* de Mohammad Taufiek Ahmad, 1929, *Islamo Esperantiste Rigardata,* originalaĵo de Colin Evans, 1946, kaj *Kial mi Kredas je l'Islamo,* 1969.

El la skizitaj grupoj de la islama religio sendependiĝis kaj disvastiĝis la religio instruita de Baha'u'llah, sub la nomo bahaismo. De la fondintoj aperis prelego *Kaŝitaj Vortoj de la Superega Plumo* (de Baha'u'llah, tr. Eroŝenko kaj Alexander, 1915), kaj la *Parizaj Paroladoj* (de Abdúl Bahá, tr. Lidja Zamenhof, 1932). Pluraj verketoj, originalaj kaj tradukaj, fontas de Lidja Zamenhof. Bona

verko estas *Baha'u'llah kaj la Nova Epoko* de J. E. Esslemont (tr. Lidja Zamenhof), 1930. Aperis, krome, kelkaj paroladoj de Shoghi Effendi, kaj multaj mallongaj broŝuroj pure informaj, ekz. *Kio Estas la Bahaa Religio?*, 1969.

El la hinda religio elstaras la traduko de la grava *Bhagavad-Gîtâ*, kiun pretigis Francisco Valdomiro Lorenz en 1942.

De konfuciismo aperis la verkoj de Konfucio mem, *Granda Lernado* kaj *Doktrino de Mezeco* (tr. Nohara kiuiĉi), 1932, kaj klasikaĵo (etika verko), *La Librokonstantaĵo de Fila Pieco* (tr. Nohara), 1933. *La Vortoj de Konfucio* (tr. Ossaka kenĵi) aperis jam en 1923.

Ankaŭ el budhismaj klasikaĵoj la rikolto estas atentinda. En 1933 aperis *Samanta-Mukha-Parivarto* (tr. Nohara), en 1936 la 7-a ĉapitro de *Saddharmapundarika-Sutro* (tr. Nohara), kaj en 1949 la unuaj 13 ĉapitroj de *Digha Nikajo* (tr. G. H. Yoxon). Pri la fondinto de la japana Zyôdo-sekto aperis verko de Isii mamine: *La Vivo de Sankta Hônen* (tr. Nisida ryôya), 1937, kun terminaro pri budhismo kaj pri propraj nomoj. De la ĉina sektofondinto K'uoan aperis la zen-a verko *La Dek Bildoj de Bovpaŝtado* (tr. Ŝibajama kei), 1930, 2-a eld. Pri la antikva reĝo Aŝoko, budhisma apostolo en Hindio, aperis *La Admono kaj Vivo de Reĝo Aŝoko* (tr. Okazaki reimu), 1937. Moderna verketo pri budhismo, eldonita okaze de la 2.500-a datreveno de la naskiĝo de Budho, estas *Ekrigardo al Budhismo* de R. L. Soni, 1956. Krome, estas menciindaj *Budhisma Katekismo* de Subhandro Bikŝuo (tr. F. Morawetz) kaj *Tiel Parolis la Budho kaj Liaj Disĉiploj* de T. T. Anuruddha, ambaŭ 1971. Fine, en 1972, aperis komentita traduko (de H.P.B.) *La Voĉo de l'Silento* el la tibeta „Libro de la Oraj Preskriboj".

El Japanio venas multaj verkoj pri la religia movado Oomoto, kiu adoptis Esperanton por siaj internaciaj rilatoj. De Deguĉi onisaburo aperis pluraj verkoj, ĉefe en la traduko de Niŝimura koogecu. Grava estas: *Fundamento de Animo*, 1926 (2-a eld. 1931). De Niŝimura aperis originala verketo en 1925: *Origino de Oomoto*. En 1964 estis eldonita tre interesa verko de Haga hideo (tr. Nakamura tazuo), *Filoj de Dio, Adorantoj de Dio*, kun fotografaĵoj pri Oomoto.

De Japanio venis krome multaj aliaj religi-enhavaj verkoj: en 1933 naŭ broŝuroj, nomitaj *Evangelioj de Belismo*, t.e. de religia grupo fondita de la Japano Okamoto rikiĉi, kaj en 1968 du informaj broŝuroj pri la religia grupo japana Tenshô Kôtai Jingû Kyô, la t.n. „danc-religio".

Aparte valora por la kompreno de la japana tradicia pens-

maniero estas la verko de Okakura kakuzo *La Libro de Teo* (tr. Nakamura tazuo), 1965.

Jam antaŭ la Unua Mondmilito ekzistis en Francio kaj en Belgio esperantistaj spiritistoj (kiuj nomis sin Esperantista Psikistaro). Ili aperigis revueton kaj broŝurojn. El tiuj medioj venas la libro de J. Thiébault *La Formortinta Amiko* (tr. Grosjean-Maupin), 1921.

Sed la spiritista kredo havas siajn plej gravajn reprezentantojn en Brazilo, de kie venas tradukoj de verkoj de la fondinto de la spiritisma movado, Allan Kardec: *La Libro de la Spiritoj* (tr. L. C. Porto Carreiro-Neto), 1946, *La Evangelio laŭ Spiritismo* (tr. Gomes Braga), 1948, *Enkonduko en la Studadon de la Spiritisma Doktrino*, 1952, *La Libro de la Mediumoj* (tr. L. C. Porto Carreiro-Neto kaj Gomes Braga), 1964. La klariga filozofi-religia verko de Francisco Cândido Xavier *Kristana Agendo* (tr. A. Afonso Costa) estis publikigita en 1962.


Kelkaj verkoj de okultistaj grupoj aperis ankaŭ en Esperanto. Ekzistas broŝuroj de framasonoj, sed interesa ĉi-rilate estas *Ĉu Vi Scias Tion pri la Framasonismo?* de W. Randag (tr. Ostubo), 1937. Aperis krome kelkaj rozkrucanaj broŝuroj kaj verketoj pri teozofio. I.a. aperis *Resumo de la Teozofia Doktrino*, 1912, kaj la verketo de M. Collins *Lumo sur la Vojon kaj Karmo* (tr. Collyn), 1922.

8.3.4 Pacismo

En 1905 aperis la originala verko de Gaston Moch *Historio Resuma de l'Arbitracio Konstanta;* en 1907 de la sama aŭtoro, *Pri Malarmo.* En 1906 de la franca pacisto Elie Ducommun (tr. V. Dufeutrel) aperis *Fundamentoj de l'Pacifismo.* En 1907 aperis la verko *Estonta Milito* de Joh. de Bloch (tr. C. Royer, F. Schuck kaj Alesiano); samjare komento al la suprenomita verko, verkita de F. Passay, B. von Suttner kaj Nattan-Larrier: *Estonta Milito laŭ la Instruoj de J. de Bloch* (tr. la samaj). La verko de Andrew Carnegie *Por Arbitracio* (tr. W. W. Padfield kaj H. Maresquelle) estis eldonita en 1907. En 1911 aperis la grava verko de la svisa pacisto-psikiatro A. Forel *Kulturceladoj de la Nuntempo* (tr. Uhlmann). Aparte valora verko estas la originalaĵo de Hector Hodler, aperinta en 1915-1917 en *Esperanto: La Pacproblemo.*

Tuj post la Unua Mondmilito (1920) aperis la dummilite skribita verko de Romain Rolland *Al la Forbuĉataj Popoloj* (tr. G. Mahn). En la intermilita tempo sekvis verko pretigita de V. Bulgakov kaj tradukita de Z. Zahariev: *Pensoj pri Perforto, Milito kaj Revolucio*, de Lev Tolstoj (1928). Verko de G. F. Wates *De Tutmonda Perforto al Tutmonda Frateco* (tr. W. Bailey) aperis en 1938.

Sciencaj Studoj: Prestiĝa volumo kun 37 sciencaj studoj, verkitaj originale en la Internacia Lingvo.



Malsupre: Politiko apartenas al la plej riĉaj branĉoj de la faka literaturo, kvankam tiun riĉecon ne akompanas ekvilibro en la origino de la eldonaĵoj.



Post la Dua Mondmilito ne plu estis multe da pacismaj verkoj: eble multaj idealoj kaj iluzioj forflugis. Rimarkindas tamen la verko de H. Thirring *La Mondopaco kiel Psikologia Problemo* (tr. Hugo Sirk), 1946, kaj *La Belan Pacon* de Yamaguti senzi (tr. Isiguro, 3-a eld. 1962). El Japanio, postmilite, venas multaj verkoj kontraŭmilitaj. I.a. *Infanoj de l'Atombombo* de Osada arata (1952, 2-a eld. 1959), *Hirošima*, 1952, *Viktimoj de la Atombombo* (de pluraj aŭtoroj, tr. Jui ĉunošin, 1968, 2-a eld. 1970), la militrakonto de Cubota joji *La Infanoj en Vento* (tr. Ito kiuzo), 1966, k.a.

Pri la *Historia kaj Filozofia Fono de la Moderna Pacifismo* verkis Harold Bing, 1971.

8.3.5 Socialismo

Jam en 1908 oni komencis rimarki la organizan kaj ideologian dividon inter la burĝa kaj proleta esperantista Movado. Sed tiu dividiĝo pligrandiĝis ĉefe post la rusa revolucio, kiu unuflanke esperigis la tutmondan proletaron por baldaŭa venko, kaj aliflanke sukcesis, almenaŭ unuamomente, kunigi multajn direktojn de la revolucia laborista movado.

Anarkistaj aŭtoroj estas reprezentitaj per Domela Nieuwenhuis *(La Piramido de l'Tiranio,* 1913), de P. Kropotkin *(La Salajro,* 1914; *Etiko,* 1926; *Al la Junuloj,* kun biografio, 1938). Aperis ankaŭ nihilismaj verkoj: *Nihilismo,* de Zamfir C. Arbure (tr. Ionesku).

De la marksistaj klasikuloj de la Unua Internacio aperis la *Manifesto* de K. Marx kaj F. Engels (tr. A. Baker), 1908. Poste tradukis ĝin E. Pfeffer, 1923. *Komentoj al la Komunista Manifesto* estis eldonitaj de SAT en 1933. Krome aperis *Karl Marx, Vivo kaj Verko* (tr. Elsudo), 1926, kaj *La Instruo de Karl Marx* (tr. de pluraj), 1933. De la germana ŝtatsocialisto F. Lassalle aperis *Pri la Esenco de Konstitucio,* 1912.

De la gravuloj de la Dua Internacio aperis *Antipatriotismo* de G. Hervé (tr. Blangarin kaj Ludoviko), 1907, *Kio Estas Socialismo,* de Enrico Ferri, *Laborista Klaso kaj Socialismo,* de M. Cachin (tr. Berland kaj Vergnaud), 1912, *Por Ataki kaj por Defendi,* de W. Liebknecht, 1913, kaj samjare la originalaĵo de Mees *La Kaŭzo de la Senlaboreco,* 1913.

Pri la unuaj jaroj de la rusa revolucio, kaj pri la Lenin-aj tezoj, aperis *Ŝtato kaj Revolucio* de V. Iljiĉ Lenin (tr. Demidjuk), 1923 (represita en Japanio en 1967). Aperis multaj broŝuroj pri la kulturaj, ekonomiaj kaj sociaj atingoj fruepokaj. Krome aperis ankaŭ ideologiaj verkoj: ekz. *Kio Estas Marksismo kaj Leninismo* de

Adoratskij (tr. Robicsek), 1932, *Jarkvino de la Oktobra Revolucio*, de L. Sosnovski, 1923.

Samepoke aperis verkoj pri la aliaj — fiaskintaj — proletaj revolucioj en la okcidentaj landoj: *Bildoj el la Germana Revolucio*, 1925; *133 Tagoj de Sovet-Hungario* (artikolaro), 1930, kaj la politika broŝuro de Béla Kun *Kion Volas la Komunistoj?*, 1919.

Pri la komunista movado raportas *Dokumentoj de Komunismo*, de SAT, 1923, *Komunista Movado*, de Demidjuk, 1924, kaj *Programo de Komunista Internacio*, 1930.

Post la morto de V. I. Lenin, J. V. Stalin iĝis ĉiopova reganto en tiama Sovetio. Ne povis manki tradukoj el liaj verkoj: *Kulturo Nacia kaj Internacia* (tr. G. Demidjuk), 1930, *Fundamentoj de Leninismo* (tr. Stellih), 1931, *Skizoj pri Lenin*, 1931, *Oktobra Revolucio kaj Taktiko de Rusaj Komunistoj*, 1932, k.a.

En 1928 la sveda komunista ĵurnalisto E. Adamson aperigis originalan libron kun skizoj kaj impresoj pri Sovetio: *Sub Ruĝaj Standardoj*.

La kvinjara plano faciligis la aperon de multaj broŝuroj. Interesaj estas tiuj de Molotov (1932) kaj de Stalin (1933). Samtempe komenciĝis la procesoj: *Akuza Konkludo en la Proceso de Industria Partio* aperis en 1930. Pri internaj sovetaj problemoj informas nin *Apud Landlimoj:* skizoj pri naciminoritatoj en Sovetio kaj socialisma konstruado, 1932, kaj *Pri Reorganizo de Laboro de la Sindikatoj en USSR*, de N. Ŝvernik (tr. P. Gavrilov), 1934. Intertempe la milito alproksimiĝis, kaj la faŝismo iĝis ĉiam pli danĝera. Pri tio atentigis verko de G. Dimitrov: *La Laborista Klaso kontraŭ la Faŝismo*, 1936. Kaj estis jam la fino: Stalin malpermesis ĉian laboron por internacia lingvo. Ernest Drezen estis mortpafita en 1937. Lian sorton sekvis multaj aliaj esperantistoj, kaj la ceteraj devis silenti.

Post la Dua Mondmilito kaj post la morto de Stalin la Movado en la komunistaj landoj reviviĝis nur malrapide, plej malrapide en Sovetunio, kie la unuaj verketoj aperis nur en 1964. Pripolitikaj estas *Direktivoj de la XXIII Kongreso de KPSU*, 1966, *Tezoj de KPSU por la 50-a Datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio*, 1967, kaj la parolado de Leonid Breĵnev *50 Jaroj de la Grandaj Venkoj de Socialismo*, 1968. Plej aktuala estas broŝuro *Tezoj de CK de KP de SU por la Centa Datreveno de la Naskiĝo de V. I. Lenin*, 1971.

Ankaŭ el aliaj socialismaj landoj venas pripolitikaj verkoj. El Bulgario venas *9-a Kongreso de la Bulgara Komunista Partio*, de Todor Ĵivkov, 1967; el Ĉeĥoslovakio *Agadprogramo de Komunista Partio de ĈSSR*, 1968; el Laoso politikaj verkoj de la partio Neo Lao Haksat (ekde 1968); el Nordvjetnamo verkoj pri kaj de Ho chi minh,

de Le duan, de Vo nguyen giap. Ankaŭ la Vjetkongoj eldonis verkojn en Esperanto: *Leteroj el Suda Vjetnamio,* du volumoj, 1964, kaj *La Fajra Elprovo,* 1965, pri la socia situacio en Sudvjetnamo. El Ĉinio multegaj verkoj pripolitikaj de Maŭ zedong, Lin biaŭ, Peng ĝen, ĉefartikoloj de *Ĵenmin Ĵibaŭ,* verkoj pri ekonomio, politika geografio, pri marksismo-leninismo, pri interŝtataj problemoj, ktp. Ekz. estas eble sekvi la tutan landliman demandon inter Ĉinio kaj Hindio dank' al la dokumentoj aperigitaj en Pekino. La famaj *Vortoj de Prezidanto Maŭ zedong* aperis en 1967 (2-a eld. 1972). La unua volumo de la *Elektitaj Verkoj* de Maŭ zedong aperis en 1971: la tri ceteraj volumoj sekvos. Oni kalkulas, ke ĝis 1969 la verkoj de Maŭ zedong tradukitaj en Esperanton konsistas el 68 libroj kaj broŝuroj kun entute pli ol 2.100 paĝoj. Plej konataj estas *Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo,* 1963; *Paroladoj ĉe Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* (2-a eld. 1966); *Strategiaj Problemoj en la Ĉina Revolucia Milito,* 1969.

Ankaŭ neregantaj socialistaj partioj aperigis verkojn en Esperanto.

Aperis *Deklaroj* de la Usona Socialista Laborista Partio en 1950 kaj en 1953. Originale aperis ankaŭ artikolaro de „Verdiro", unue aperinta en angla trockista revuo: *Elingita Glavo,* 1962.

El la socialdemokrata aŭ utopiista kampo aperis la fama *Leteroj al Brigito* (instruoj por la socialista partio), de J. B. Séverac (tr. Solsona), 1933, kaj la verko de L. Tolstoj *Kristanismo kaj Patriotismo* (tr. Maĉernis), 1931.

De la aŭstromarksisto K. Renner aperis la broŝuro *De la Liberala al la Sociala Ŝtato,* 1950.

Pri ĝeneralaj laborproblemoj aperis *La Internacia Labor-Oficejo,* 1932, *Sveda Laborista Movado,* de Tage Lindbom (tr. M. Johansson), 1947, kaj *La Konsumkooperada Movado en Svedujo,* de Odhe kaj Lundberg, 1963. Mallongan informilon eldonis la Liberaj Sindikatoj: *Internacia Konfederacio de Liberaj Sindikatoj,* 1968.

Socikritika rakonto verkita en 1931, kiu siatempe furoris en Novzelando, estis prezentita al la esperantlingva publiko nur en 1972: *Infanoj de la Malriĉuloj* de John A. Lee (tr. Bertram Potts).

Pri ĝeneralaj problemoj etik-filozofiaj de socialismo informas *Skizo pri Filozofio de la Homa Digno,* de Gille (tr. Lanti), 1934. En 1924 (2-a eld. 1927) aperis la originala verko de E. Izgur *Nur Volu!;* de la sama aŭtoro, ankaŭ originale, en 1926 *Je la Nomo de l'Vivo.*

La movado liberecana, nomita sennaciismo, fondita de Eŭgeno Adam (ps. Eŭgeno Lanti) unue kunfandiĝis kun la ĵuskreita komunista movado, sed oni ne povis eviti skismon, kiam la porsoveta alo (SEU) forlasis SAT. De tiu sennaciisma ideologio venas plu-

raj verkoj. Lanti mem verkis *For la Neŭtralismon!*, 1922 (3-a eld. 1928), *Manifesto de la Sennaciistoj* (lasta eldono 1951), *La Laborista Esperantismo*, 1928, *Naciismo:* studo pri deveno, evoluado kaj sekvoj, 1930, *Vortoj de K-do Lanti* (artikolaro el *Sennaciulo* kaj el *Le Travailleur Espérantiste)*, 1931, *Absolutismo*, 1934, *Herezaĵo*, 1934, *Ĉu Socialismo Konstruiĝas en Sovetio?*, 1935, *Leteroj*, 1940. De V. Elsudo (ps. de V. Kolĉinskij) aperis *A.B.C. de Sennaciismo*, 1926, kaj de Georges Bastien politika verko kun baza ideologio analoga al tiu de Lanti: *La Liberecana Socio* (tr. Ozre), 1932.

Ne povis manki marksisma kritiko: Ejdelmann kaj Nekrasov originale verkis libron sub la titolo *Sennaciismo kaj Internaciismo*, 1930.

Fine, aperis kelkaj verkoj pri la signifo de lingvo internacia por la proleta movado: De A. R. Jodko *Laborista Klaso kaj la LI* (ruslingva), 2-a eld. 1925; de E. Izgur *Organizo de Internacia Solidareco — IL je la Servo al Proletaro*, 1928; kaj de St. Ĝuĝev *Lingvo kaj Socio* (rolo de la esperantistaj organizaĵoj), 1946.

8.3.6 Ekzaktaj Sciencoj kaj Naturaj Sciencoj

8.3.6.1 *Komunaj Verkoj; Verkoj Ĝeneralaj.* — En 1911 aperis la verko de Bührer kaj Saager (tr. J. Schmid) *La Organizado de la Intelekta Laboro.* Komuna verko, kun 11 originalaj sciencaj artikoloj, aperis jam en 1921: *La Vendreda Klubo.* En 1928 estis eldonita grava verko de la Sovetiano Fersman: *La Vojo al Scienco de Estonto* (tr. Rublov). Sed komunaj verkoj nur post la Dua Mondmilito iom oftiĝis. La prelegoj de la *Somera Universitato* en Malmö (1948) aperis en 1949, la prelegoj de la *Somera Universitato de la 38-a Japana Kongreso* en 1951, kaj *Elektitaj Prelegoj de ISU 1949-1954* en 1955. Sed la plej rimarkinda tiaspeca verko estas *Sciencaj Studoj*, volumo kun 37 originalaj studoj pri natursciencoj, ekzaktaj sciencoj, biologio, lingvistiko, ktp., eldonita de ISAE en 1958.

Laŭdinda estas prelegokolekto (el GEJ-seminario): *La Mondpercepto de la Modernaj Natursciencoj*, 1967 (red. H. Behrmann).

8.3.6.2 *Matematiko, Fiziko, Astronomio.* — Jam en 1906 aperis la originala verko de Dambrauskas (Dombrovski) *Pri Unu Speco de Kurbaj Linioj Koncernantaj la Kvinan Eŭklidan Postulaton;* samjare alia originala verko de la sama aŭtoro: *Pri Novaj Trigonometriaj Sistemoj.* De Edw. V. Huntington aperis *Elementa Teorio de la Kontinuo* (tr. Bricard), 1907. R. de Saussure verkis la originalan verkon *Geometrio Folietara*, 1908. Al la hungara matematikisto Cyrillo Vörös ni dankas du verkojn: *Analitika Geometrio Absoluta*, du volumoj, 1910-11, kaj *Elementoj de Geometrio Absoluta*, 1911.

Ch. Laisant, mem esperantisto, skribis originale kelkajn broŝurojn, multajn artikolojn primatematikajn kaj, en traduko de Camescasse, *Inicado Matematika*, 1914. Du italaj matematikistoj submetis studojn ankaŭ en Esperanto: P. Cattaneo: *Determino de Iaj Lokoj Geometriaj Planaj*, 1923, kaj A. Barbacetto: *Nova Nombrado*, 1932. O. Reiersøl aperigis ekde 1950 multnombrajn matematikajn studojn, ĉefe pri aplikita matematiko, en revuoj, kaj libroforme. Ne forgesendas ankaŭ la granda matematikisto Fréchet, kiu aperigis multajn matematikajn verkojn ankaŭ nacilingve; en Esperanto li verkis artikolojn en nacilingvaj revuoj kaj en Esperantaj periodaĵoj. De li aperis i.a. *Determinado de la plej Ĝeneralaj Planoj*, 1953, kaj *Paraanalitikaj Funkcioj*. De F. E. Andrews aperis, en 1959, mallonga verketo pri la dekuma kalkulsistemo: *Ekskurso en Nombroj*. Bona enkonduko por laikoj estas la originalaĵo de H. D. Maas, *Matematikaj Metodoj en Lingvistiko*, 1972.

Pri astronomio kaj fiziko aperis *Sunhorloĝa Konstruo* de S. Poljanskij, 1903 (3-a eld. 1909), en 1907 *La Kalendaro*, scienca studo de P. de Lengyel, en 1910 la verketo de S. Blaĵko *La Kometo de Halley* (tr. W. Szmurlo). Samjare estis eldonita la verko de Nordmann *Metamorfozoj de la Steloj* (tr. Mannevy). Popularsciencan verkon pretigis M. Finot: *Vidaĵoj de Senlimo*, 1911. Post la unua Mondmilito, E. Wüster ekkonatiĝis per originala verko *Fizikaj Grandoj kaj Iliaj Unuoj*, 1921. De Sovetiano Fersman aperis en 1925 la verko *La Kemio de l'Universo* (tr. Rublov). Pri astrofiziko verkis L. Korinna, 1931. En *Verkoj de Nakamura*, kolekto el artikoloj kaj prelegoj de Nakamura kijoo, 1932, troviĝas pluraj artikoloj pri matematiko, fiziko kaj meteologio. En 1950 aperis valora *Historio de Yukawa-Teorio;* en 1953 la originalaĵo de Tomonaga sin'itirô *Fotono ĉe Juĝejo*. Popularscienca verko estas la *Totala Suneklipso 15.2.1961*, originalaĵo de Ljubić kaj Divjanović, 1960. En 1968 aperis originalaĵo de M. Halvelik pri la problemo de la *Kŭasaroj*. En 1970 aperis fakverko de Liisi Oterma: *Pri la Kometo 1939 IV P/Väisälä* (serĉefemerido por 1971-72). En 1971 aperis la valora popularscienca originalaĵo de Alberto Fernández *Senĝenaj Dialogoj*, kiu celas popularigi la fundamentajn demandojn de fiziko kaj astronomio; ĝi jam ekzistas en franca traduko.

8.3.6.3. *Aplikitaj Natursciencoj.* — En 1904 aperis *Rezisteco de la Ferkolonoj* de F. Villareal. De Mendelejev aperis *Provo de Kemia Kompreno de l' Monda Etero* (tr. I. Četverikov), 1904. Samjare aperis la verko de Helte *Pri la Teorio de l' Jonoj*. En 1906 aperis *Elementa Fotografa Optiko*, originalaĵo de Ch. Verax (ps. Karlo Verks). En 1928 aperis grava originala studo de inĝ. Isbrücker: *La Evoluo de la Telefonio*.

Sed nur post la Dua Mondmilito grandiĝas la kvanto de studoj aperantaj en Esperanto. Tiel, aperis *Tubĉj por Mezuri Premojn de Fluaj Mediumoj*, 1963; *Kvanta Mezuro de Gasoj el Nuklefendiĝo per Gamaspektrometrio* (multaj aŭtoroj, tr.), 1964; *Aktiveca Mezuro de la 14-Karbone Markita Barikarbonato per Scintilaj Ĝeloj* (Gilli kaj Bisci), 1964. Interesa estas ankaŭ la junulara verko *Amuzo per Scienco*, de Charles Vivian (tr. Duncan), 1962. Lastatempe aperis *La Fundamentoj de Elektrokemio kaj Elektrodeponado* de Samuel Glasstone (tr. J. McCarthy), 1968. McCarthy verkis en 1964 ankaŭ serion de interesaj originalaj studoj: *Galvanizado de Bismuto sur Ŝtalon el Alkalaj Elektrolitoj, Taksado pri Modifita Fericianida Provo Kiel Indikilo pri la Poraro en Stanita Ferlado*, kaj *Metodo pri la Produktiĝo de Belaspektaj Brunaj Oksidaj Kovraĵoj sur Ŝtalo.*

Pri inĝenierkemio cetere verkis antaŭ la Dua Mondmilito ankaŭ Japanoj, i.a. Maeda en 1926, 1928, 1934 kaj Yamane en 1931 kaj 1932.

Pri hidrologio temas verko de G. Makkink *Kvin Jaroj de Lizimetro-Esplorado.* Pri radiofonio verkis Eugène Aisberg la faman *Mi Komprenas Fine la Radion!*, 1934.

Meteologiaj verkoj kaj raportoj de observantoj kaj observejoj aperis en Esperanto ĉefe intermilite (1923, 1931, 1932, 1933, 1934). La aerologia observejo de Tateno (Japanio) eldonis esperantlingvajn raportojn en 1926, 1928, 1929, 1930, 1931, 1933, 1934 kaj 1935.

Pri speleologio aperis en 1921 verketo de K. Absolon *Moravia Karsto.* En 1959 aperis la originala popularscienca verko de Leander Tell *La Bela Subtera Mondo.* En 1965 aperis *Elementoj de Geologio* en ses lingvoj (inkl. de Esperanto).

Pri oceanografio aperis la raporto de J. Richard *Scienca Krozado de la Ŝipo „Princesse Alice"*, 1904.

Pri kristalografio aperis *Kristalaj Proprecoj...* de I. M. Saenz kaj A. Amit, 1962.

8.3.6.4 *Biologio.* — Pri ĝeneralaj problemoj aperis verko de Takase toyokiti (tr. Hattori tôru) *Pri Rilatoj inter Kemiaj Strukturoj kaj Fiziologiaj Agoj*, 1938. En 1971 aperis la verko de Egami fujio *La Serĉado de la Vivo* (tr. Matuba kikunobu), pri la biokemiaj problemoj de la vivo.

Pri evolu-teorio kaj homologio (kaj heredoscienco): Aperis en 1909 la verko de Le Monnier *Evolucio de la Evoluciismo* (tr. E. Noël). Pri heredproblemoj, ĉefe familiaj, aperis *La Mistero de l'Sango*, de Forst de Battaglia (tr. T. Jung), 1933. La moderna verko de J. Rostand *La Nuna Stato de l'Evoluismo* (tr. J. kaj M. de la Court) aperis en 1950. Pri la heredoscienco kaj homo verkis R. Nordenstreng, *La Homaj Rasoj de la Mondo: Scienco kontraŭ Superstiĉo*, 1935, kaj P. Neergaard, *Scienco kaj Pseŭdoscienco pri Heredo*

kaj Raso, 1937. Fine, pri la homiĝo, aperis la verko de A. Keith *Pri la Origino de l'Homo*, (tr. McCormick), 1928. Interesa popularscienca originalaĵo tre aktuala estas *Estiĝo de la Tero kaj de la Homo*, de Leander Tell, 1971.

Pri botaniko aperis tre multe da verkoj. La plej interesaj estas *Studadoj de la Ĉerizfloro sub la Fenologia Vidpunkto* de Taguĉi tacuo, 1935, la originalaĵo de A. L. Malmanche *Botanika Klasifiko*, 1938, kaj la verko de Frank Booth *Arboj de la Arbaro kaj Kampo*, 1947. Sed la plej reprezente modernajn verkis P. Neergaard: *Atakoj kontraŭ Ĝardenplantoj*, 1954, kaj *La Vivo de la Plantoj*, 1957. *Kiamaniere Distingi la Fungojn* estas verko de Mario Simondetti, 1961. En 1963 aperis *Indekso de Semoj, Bulboj kaj Vivaj Plantoj*. La verko de Hori ŝoiĉi, *La Volvotigo de Amikeco*, 1965, enhavas skizojn pri botaniko kaj pri zoologio. Post la Dua Mondmilito aperis en Danio multaj artikoloj pribotanikaj kun Esperantaj resumoj.

Ankaŭ zoologion traktas verkoj. En 1912 aperis *Kvin Prelegoj pri Bakterioj* de Odo Bujwid (tr. E. Pfeffer). En Japanio, intermilite, aperis pluraj verkoj pri eksperimenta zoologia biologio: *Eksperimentoj per Skizostomiazo*, de Fukutani, 1926; du artikoloj de Oshima pri *Piknogonoj* en 1927; en 1929 artikolo de Oshima hiroshi pri *Hermafrodita Marstelo Asterina Batheri Goto*, kaj en 1935, de la sama aŭtoro, *Pri la Maturiĝo, Fekundiĝo ĉe la Ovo de l'Markukumoj*.

Postmilite aperis la bela porinfana *Bildlibro pri Bestoj*, 1961, la prifiŝa *Sekretoj de la Marestaĵoj*, de Petar Giunio, redaktita de Marinko Gjivoje, 1960. De Kawamura sin'itirô citindas *Studoj pri Ameloj de Legumenoj*, 1963. De Ebbe Skjerninge aperis en 1967 *La Migrantaj Cirkonstancoj de la Danaj Migrantaj Birdoj*. En 1969 aperis *Enkonduko en la Grundosciencon: El la Polvo de la Tero*, de W. F. Rolt. Pri la biologia aspekto de la insuloj Tajvano kaj Jaejama aperis la verko de Hori ŝoiĉi *La Vojaĝo al Sudaj Insuloj*, 1971.

8.3.6.5 *Medicino.* — Libroforme aperis la konsilaro de E. Javal *Inter Blinduloj: Konsiloj por Jusblindiĝintoj* (tr. s-ino Javal), 1907. La verko de O. Burwinkel, *La Kormalsanoj* (tr. Kunschert) aperis en 1909. De W. Winsch aperis *Pri Varmokulturo* (tr. William), 1913, kaj *Pri la Elektra Aktiveco de Nia Korpo*, 1918. R. Stolle verkis *Konsiloj pri Higieno*, 1911 (2-a eld. 1923). Intermilite aperis multaj esperantlingvaj studoj ĉefe en japanaj medicinistaj ĵurnaloj, aŭ japanlingvaj, kun Esperanta resumo. Pri anatomio verkis plurajn Nishi seiho, Itabasi koh (1928), Okuda (1953), Sekido, Takahasi (1953). Pri patologio verkis Nisikawa (1925), Nisi ken'itirô (1926), Shinoda hideo (1932), A. Babadagly (1926), Kubo (1925). El la iom ampleksaj traktaĵoj esperantlingvaj citindas la verko de Tamura kaj Hayashi *Farmakologia Praktiko por Studentoj* (tr. Eskulapida

Klubo) kaj la *Medicina Bildaro Fotografa: Atlaso pri Elefantiazo kaj Filariazo*, ambaŭ aperintaj antaŭ la Dua Mondmilito. La Eskulapida klubo eldonis ankaŭ *Medicina Krestomatio de Esperanto*, 1924. Alia krestomatio, pretigita de Yagi hideo, *Medicina Krestomatio*, aperis en 1935.

Aperis en la lastaj jaroj *La Arto Fariĝi Centjara*, de L. Wegener, 1953; *Miologio de la Japano*, de Nishi seiho, 1953; *Okabayashi-a Operacio Plenumita de ...Yamagata*, de Shinoda, 1955; *Kiel Kuracas la Naturista Medicino*, de J. Scolnik, 1961; *Lernolibro de Oftalmologio* de Kato seiiĉi, 1961 (2-a eld. plibonigita: 1963); *Quaestionarium Medicum* en 17 lingvoj de F. Meyboom, 1961; *Nia Korpo* de Nishi seiho, 1961 (2-a eld. 1964), kun informoj por laikoj.

Faktoj pri *Atombomba Malsano*, science korektaj, por laikoj, aperis en 1970. Nishi seiho redaktis *Tagiĝo de la Eŭropa Medicino en Japanio* kaj F. Faulhaber tradukis la utilan verkon de Schreuder kaj Diatlowicki-Tobi *Geriatrio kaj la Ĝenerala Zorgo por Gemultjaruloj*, ambaŭ 1971. En la posta jaro sekvis: Katalogo de Philips pri radio-aparatoj en medicino; la seks-instrua *ABZ de Amo* de Inge kaj Sten Hegeler; *Farmakologio por Malbonuzoj de Medikamentoj* de Todokoro sakutaro; kaj *Ĝenerala kaj Homa Histologio* de W. M. A. de Smet.

Aparte specialigitaj estas la jenaj verkoj: *Provo por Akiro de 1-Tiroksino Markita per I-131*, de J. L. Servian, 1963, kaj *Limfografio de la Testika Limfunuo* (klinikaj aplikoj) de M. Ángel Sica kaj R. Rodríguez Sica, 1963. Valora libreto venas el Ĉinio: *Akupunkturo kaj Kaŭterizo de Ĉinio*, 1964, kaj alia el Suda Vjetnamo: *Esenco de la Problemo pri la Maljuniĝo*, originalaĵo de Dza trang (tr. Dinh van van), 1968 kaj 1970.

Intermilite rimarkindas sinsekvo da artikoloj, ĉefe el Japanio, pri A-, B- kaj C-avitaminozoj; pri patologio, hematologio, dietologio, beriberio, parazitologio kaj serologio dum tiuj avitaminozoj. Utila estas la *Bibliografio de Medicina Literaturo Esperanta en Japanujo*, 1956.

8.3.7 Sociaj Sciencoj

8.3.7.1 *Psikologio kaj Pedagogio.* — *La Principoj de Psiĥologio* de St. Brzozowski (tr. M. Kaus) aperis en 1910. En 1924 aperis la verko de E. Coué *La Regado de Si mem per Konscia Aŭtosugestio* (tr. J. Borel). En 1925 aperis la originalaĵo de P. Bovet *Psikanalizo kaj Edukado*. Samjare aperis *Penspotenco* de A. Mills (tr. W. Bailey). En 1926 aperis la originalaĵo de S. Ziegler *Sekspsikologio*. Samjare aperis grava originalaĵo de la fama Ch. Baudouin, *La Arto de Memdis-*

ciplino. Estonta Eduko, de la renoma pedagogo A. Ferrière (tr. Danneil), sekvis en 1929. *Enkonduko en la Pedagogion,* originalaĵo de Hillar Sakaria, aperis en 1932 (temas pri enkonduka historia skizo). Alia verko de A. Ferrière aperis en 1939: *Kiel Eduki Niajn Infanojn?* (tr. H. Ith). En 1938 aperis valora libro de Dorothy Canfield Fisher: *Infanoj kaj Patrinoj* (tr. Guéritte). Postmilite originale verkis Kl. Wieczorek: *Kiel Aŭtodidakto al la Pedagogia Scienco,* 1957. Popularscienca verko de Martin Kojc, *La Lernolibro de la Vivo* (tr. elgermane de Isbrücker) aperis en 1962. Valora verko estas ankaŭ la libro de H. Thirring *La Mondopaco kiel Psikologia Problemo* (tr. H. Sirk), 1946. Lastatempe aperis la verko pri GDR, *Klereco por Hodiaŭ kaj Morgaŭ,* kaj du verkoj el Norda Vjetnamo: *La Vjetnama kaj Ĝia Utiligo por la Supera Instruado en VDR,* 1969, kaj *La Ĝenerala Instruado en VDR,* 1971 (pri la lukto kontraŭ analfabetismo). En 1970 aperis sufiĉe ampleksa verko de Rudolf Rakuŝa: *Metodiko de la Esperanta Instruado.* Verko kun tre originala tezo estas la libro de S. Sakellaropoulos *La Telepatio kaj Ĝia Socia Signifo,* 1968.

8.3.7.2 *Juro.*— En 1919 aperis la teksto de la *Kontrakto de la Ligo de Nacioj. Kriminologio,* verko de Rustem Vámbéry, estis tradukita de V. Tóth (1924). En 1930 aperis la studo de la Ĉeĥo J. Vavrovský *Krimuloj Profesiaj. Internacia Jura Revuo* aperigis la valoran artikolaron „La Pozicio de Advokato en Diversaj Landoj" (1960). Gravan internacijuran studon originale verkis Prof. I. Lapenna: *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo* (1952). Fine, estas menciindaj Esperantaj tradukoj de la *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj* (unuafoje en 1963) kaj de la *Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj* kaj *Statuto de la Internacia Kortumo,* ambaŭ en unu broŝuro (1970).

8.3.7.3. *Lingvistiko.* — *Bukedo* estas la titolo de ampleksa kolekto de eseoj, kiujn originale verkis la franca lingvisto Ch. Lambert. Th. Cart estis la aŭtoro de la broŝureto *Pri la Indo-Eŭropaj Lingvoj kaj Esperanto* (1910). Bonan popularsciencan enkondukon pretigis Prof. Collinson, *La Homa Lingvo* (1927). La teoriojn de N. Ja. Marr prezentis A. P. Andreev en *Revolucio en la Lingvoscienco* (1929). Post la milito aperis la monumenta verko de Ivo Lapenna, *Retoriko* (1950, 3-a eld. 1971) kaj, krome, *Lingva Esprimkapablo kiel Funkcio de la Vorttrezoro,* studo de V. Setälä el la revuo *Esperantologio* (1949), represita en lia *Fortoj de l'Vivo* (1967), *Dialekto, Dialektiko* de Delfi Dalmau (1956) kaj *Universala Skribo* de Manuel Halvelik (1966). Ankaŭ naciaj lingvoj estis konatigitaj per Esperanto: ni menciu *Franca Gramatiko por Esperantistoj* de Boulet (1907), *Gramatiketo de Friulana Lingvo* de J. Bianchini (1909), *Trezoro de l'Lingvo Friula* de Tellini (du volumoj, 1919-20) kaj *Japana Gramatiko por Es-*

perantistoj de Miyatake seidô (1939). Enkondukon en la ĉinan lingvon aperigis la revuo *El Popola Ĉinio*. Notindaj estas, fine, multnombraj esperantologiaj studoj de Kawasaki naokazu, Okamoto joŝicugu kaj Ossaka kenĵi, el kiuj la plimulto tamen estis verkita japanlingve.

Referaĵoj pri lingvaj, kulturaj kaj lingvopolitikaj problemoj, faritaj dum *Seminario „Lingvo kaj Kulturo"* de TEJO, estis publikigitaj en 1971.

8.3.7.4 *Papirologio.* — Aperis en 1927 *Grekaj Papirusoj el la Nila Valo*, de Julius Penndorf.

8.3.7.5 *Historio.* — La fama verko de Henri Dunant *Rememoroj pri Solferino* (tr. Vaillant kaj Fruictier) aperis en 1906. *Resumo de Ukraina Historio*, de Myĥajlo Hruŝevskyj (tr. Kuzjma) aperis en 1922. La libro de Benito Mussolini, *La Antikva Romo Surmare* (tr. Paolet) estis eldonita en 1928. Originala verko prihistoria estas *Jarmiloj Pasas*, de H. Haefker, 1930. La verko de G. F. Wates, *Progresado kaj la Pasinteco* (tr. W. Bailey) aperis en 1936. *La Historio de la Japana Imperiestra Trono* aperis en 1941, en kompleta traduko de Nohara kiuiĉi. H. Theobald redaktis *Dokumentoj de la Rezistado*, pri la germana interna rezistado (1948). En 1947 aperis la verko de la antifaŝisto Hermann Wagner, *Ni Devas Diri Ĝin*, ankaŭ kun dokumentoj. *Historio de Usono*, populara verko de A. da Silva (tr. M. de Freitas) aperis en 1947, kaj *Historio de Nederlando*, de la sama aŭtoro (tr. J. de Freitas) en 1948. Raporto pri koncentrejo aperis en 1967; *Auschwitz 1940-45* (tr. A. Turek), verko de Kazimierz Smolen. Pri la historio de l'antikva Vjetnamo informas *La Tradicia Vjetnamio* (red. Nguyen khac vien), 1970. Pri la vjetnama historio de 1847 ĝis 1945 informas *Unu Jarcento de Naciaj Luktoj* (1970), kaj pri modernaj momentoj de la vjetnama historio informas *Neforgeseblaj Tagoj* (pri la ĝenerala ribelo 1945-46) de Vo nguyen giap, 1971, *La Kampanjo Kao Lang* (pri 1950), de Nguyen huy tuong, 1962, kaj *Djen Bjen Fu*, 1962, de Tran do. Pri la ĉina revolucio temas la libro de Hanna Kobylinski (tr. Graversen): *La Revolucio de Ĉinio 1800-1949*, 1956.

8.3.7.6 *Ekonomiko.* — En 1912 aperis la verko de J. B. Marchlewski *Ekonomio Socia* (tr. E. Pfeffer). De la ekonomikisto Silvio Gesell aperis *La Reforma Mono* (tr. P. Stanišić), 1913, kaj *Oro kaj Paco* (tr. de la sama), 1926. En 1923 aperis la verko de L. Ekstrand kaj M. Kovero *La Ekonomiaj Fortoj en Finnlando*, kaj proks. en la sama epoko aperis la verko pri la socikredita teorio *Maŝinoj, Mono kaj Mondpaco*, de M. C. Hattersley. Interesa el la historia vidpunkto estas la verko de la konata ekonomikisto Tugan-Baranovskij *La Komunumo de Duñoboroj* (tr. M. Šidlovskaja), 1922. Edward Bel-

lamy verkis la socian romanon, kiu inspiris ekonomi-utopian movadon, *Rigardante Malantaŭen en la Jaro 2.000* (tr. Hamaker), 1937. De Horrabin aperis *Skizo de Ekonomia Geografio* (tr. B. Ross), 1938, kaj en 1962 pri la bulgara nacia ekonomio informis *En Konkurado kun la Tempo,* de S. Rusinov.

8.3.7.7 *Kulturetnologio.* — Pri kulturetnologio aperis tri interesaj verkoj: *Tutmondaj Fajrokutimoj* de H. W. Southcombe, 1905; *Pri la Origino de la Homo* (precipe pri paleontologio) de A. Keith (tr. McCormick), 1928; kaj *La Prahistoria Arto* de A. da Silva (tr. J.F.M.), 1947.

Aperis multe da verkoj pri apartaj popoloj: jam en 1898 la verko *La Slavoj* de P. Milukov (tr. Laskin). Kulturhistorian problemaron prezentas la verko de E. Privat *Ĉe l'Koro de Eŭropo,* 1909. Etnologian signifon havas la verkoj *Brazilio* de Ev. Backheuser, 1909, kaj *La Bulgara Lando kaj Popolo* de Iv. Krestanov, 1919. Originalan verketon pri *Albanio* eldonis Hj. Unger en 1923. J. Mangada-Rosenörn skribis libron *Pri Hispanio kaj Ĝiaj Popolkantoj,* 1926, kaj Delsudo (ps. de Arthur M. Hyde) kaj Lauri Laiho aperigis la originalan verkon *Aŭstralio, Lando kaj Popolo,* 1927. En 1930 aperis *Traktato pri la Origino de Japana Popolo,* de Tokieda motojuki (tr. Hiraoka). Kulturgeografia verko pri Islando estas *Islando* (lando, vivo, literaturo) de Olafur Kristjansson (1930). *Ŝtala Biblio de Samurajismo,* originala verko de Cujuki kijo, aperis en 1932. De P. A. Smirnov aperis *La Kirgizoj* (tr. Averin), 1934. C. C. Cowling verkis *Pri la Iamaj Tasmanianoj,* 1935. La originala verko de Lakshmiswar Sinha *Hindo Rigardas Svedlandon* aperis en 1936, kaj la verketo de Peider Lansel *La Retoromanĉoj* (tr. Agricola, ps. de Hans Jakob) aperis en 1938.

Post la Dua Mondmilito venis ankoraŭ pluraj tiaj verkoj. I.a. ni rimarkas *Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo,* 1946; la verkon de Thor Heyerdahl *Ekspedicio Kon-Tiki* (tr. Brynildsen), 1951; *Jugoslavio kaj Ĝiaj Popoloj,* 1953; la originalaĵon de Kenneth G. Linton *Kanako el Kananam,* pri novgvineaj kutimoj kaj moroj, 1960. La ĝeneralajn trajtojn de la kulturaj interŝanĝoj de oriento-okcidento pritraktas G. Fradier en *Oriento kaj Okcidento al Reciproka Kompreno?* (tr. C. D. A. Capp), 1962. Eseeton originalan pri *Nô* (speco de japana tradicia teatro) verkis Nakamura tazuo, 1963. La postan jaron, 1964, aperis la eleganta originalaĵo *Enciklopedieto Japana,* de la sama aŭtoro, altvalora trezorejo de informoj pri la kultura, historia kaj etnologia aspektoj de Japanio. Verko pri la ĉina gimnastiko *Tajĝiĉjuan* aperis en 1964. En 1965 *La Libro de Teo* de Okakura kakuzo (tr. Nakamura t.) informis pri la japanaj tradiciaj penso kaj moroj. Komence de la kvindekaj jaroj aperis ankaŭ la tekstoj de pluraj

filmoj kun etnologia temo. Ili pritraktas i.a. la Indianojn, la Eskimojn, la Laponojn, la Arabojn, la Buŝmanojn, la Tibetanojn, ktp. Lastatempe aperis verko de Tibor Sekelj *Nepalo Malfermas la Pordon,* 1959. De la sama aŭtoro, en traduko elhispana de Sonnenfeld, aperis en 1970 la verko *Tra Lando de Indianoj.* Samjare aperis la artikolaro de la japana ĵurnalisto Honda katuiti *Vilaĝo en Batalkampo* (tr. Konisi gaku) pri la liberiga milito de Vjetnamo. Fine en 1971, aperis libro de U. J. Moritz pri la hispana etnia problemo: *Problemoj de Etnaj Minoritatoj en Hispanio,* originale verkita en Esperanto. Alian originalaĵon, *La Vojaĝo al Novzelando,* publikigis Hori s. en 1972.

8.3.7.8 *Geografio.* — Antaŭ la Unua Mondmilito aperis, en 1906, la verketo de Ch. Lemaire *Tra Mezafriko.* En 1918 aperis la priesplora klasikaĵo de H. B. de Saussure *Ascendo al Monto Blanka* (1787) (tr. R. de Saussure). En 1919 venis originala verko de Iv. Krestanov, *El la Proksima Oriento.* Aperis ankaŭ *Aktoj de la 9-a Internacia Geografia Kongreso en Ĝenevo.*

Postmilite Nekrasov verkis *Tra USSR per Esperanto,* 1926. En 1930 aperis raporto de A. Strindberg kaj Fraenkel *Per Balono al Norda Poluso* (tr. Stellan Engholm). La moraviaj pioniroj tradukis la postan jaron (1931) la raporton de Jan Welzl *30 Jaroj en la Ora Nordo.* La raporto de Sten Bergman *Tra Sovaĝa Kamĉatko* (tr. Gerdman) aperis en 1932. En 1935 kaj 1936 aperis la originalaj memoraĵoj de Stjepan Misak, Slavo loĝanta en Turkio: *Tra Mistera Oriento.* La verko de van Loon *Rigardu la Teron* (tr. G. Saville) aperis en 1937. En 1942 aperis libro de A. da Silva: *Lasta Vojaĝo de Scott* (tr. M. de Freitas), kaj la postan jaron (1943), de la sama aŭtoro, *Piccard en la Stratosfero* (tr. J. B. A.).

Post la Dua Mondmilito aperis pluraj interesaj verkoj. En 1955 aperis la geografia fotolibro de van Wijk *Nederlando.* Tibor Sekelj tradukis la raporton *Tempesto super Akonkagvo,* el la hispana originalo. De G. Gorov aperis *Nigramara Bordregiono de Burgas,* 1962. Samjare aperis la verko de J. Bacquer *La Kun-princlando Andoro* (tr. Ribot). *Konciza Geografio de Ĉinio,* de Ĵen ĵudi, sekvis en 1964. Samjare aperis la libro *Nederlando* de Jaap Romijn kaj Kees Scherer, kun multaj ilustraĵoj. De „Julieta" aperis en 1965 *Gvidlibro tra Paris.* De Gyula Németh aperis la verko *Vojaĝlibro de Hungario,* 1965. De Ernö Mihályfi aperis *Hungario sur Bildoj,* 1965, kaj, la postan jaron, 1966, aperis la verko de Wisnovszky kaj Almássy *La Akvo kaj la Homo en Hungarlando.* La originala verko de M. Haudebine *Utila Manlibro pri Hindujo* aperis en 1967. En 1968 aperis esperantlingva *Mondmapo. Poŝatlaso de la Mondo* (kun mapoj

kaj geografiaj resumoj) aperis en 1971. Enhavon geografian, kulturan kaj politikan havas *Resumo pri Vjetnamio*, 1971. Turisma estas *Jen Londono!*, gvidilo de John Lewesdon (tr. J. C. Wells), 1971. *La Dolĉa Franclando*, originalaĵo de Pierre Delaire, aperis en 1972.

8.3.7.9 *Politiko.* — Aperis esperantlingve la konstitucio de pluraj ŝtatoj, i.a. de USSR (1937), de la Ĉeĥoslovaka Respubliko (1948), de la Popola Respubliko Bulgario (1950), kaj la Japana Regno (1964).

Esperanto estas lingvo, kiu, dum politikaj krizoj, aŭ dum militoj, estas ofte uzata de unu el la partioj, aŭ de ambaŭ, por popularigi internaciskale la propran starpunkton. Tial oni ne miras, kiam oni konstatas, ke dum la Unua Mondmilito aperis italaj, francaj kaj germanaj propagandiloj: i.a. la *Blanka Libro* de la Imperiestra Germana registaro (1915/16). Post la milito venis ankoraŭ tiaspecaj verkoj, ĉefe el la venkitaj ŝtatoj, i.a. *Por la Rajto de German-Aŭstrujo*, 1919, kaj *La Kartludo pro Supera Silezio*, de W. Stahlberg, 1921. Pli poste aperis la verko de Smogorzewski: *Pol-Pomeranio* (tr. S. Kornfeld), 1932, kaj la litovdevena *Nia Batalado por Vilnius*, 1933. En 1934 aperis *Mia Vojaĝo en Sovetio*, de A. Słonimski (tr. Kornfeld). Intertempe el Ĉinio la kontraŭjapanaj verkoj, verketoj kaj revuoj atingis Eŭropon — ĝis la definitiva venko de Maŭ zedong. La samo ripetiĝis post la Dua Mondmilito. Ekz. aperis *Volo kaj Vojo de Saarlando*, de J. Hoffmann, 1951; la slovendevena *Triesto, al Kiu?*, 1953; multe da libroj, propagandiloj, broŝuroj okcidentgermanaj kontraŭ la Germana Demokratia Respubliko, kontraŭ la divido de Germanio, kontraŭ la situacio en Orient-Berlino, kontraŭ la pola administro en la iamaj regnaj teritorioj (ekz. *La Germanaj Orientaj Teritorioj*, 1960), ktp. Ilin respondis orientgermanaj informiloj kaj polaj broŝuroj, i.a. *Polaj Okcidentaj kaj Nordaj Teritorioj*, de T. Derlatka kaj J. Lubojański, 1966. Pri la vjetnama milito informas la verko de Quang loi, *Sude de la 17-a Paralelo*, 1960, kaj la libro de Luu quy ky, *La Vjetnama Problemo*, 1967.

Aperis cetere ankaŭ verkoj ĝeneraltemaj pri politiko. Plej interesa afero estas, ke unu el la unuaj originalaj politikaj verkistoj estis L. L. Zamenhof. Ni menciu tie ĉi nur: *Hilelismo: Projekto pri Solvo de la Hebrea Demando*, ruslingva, 1901 (represo, kun traduko de A. Holzhaus, 1972), *Memuaro Verkita por la Kongreso de Rasoj*, 1911, kaj *Alvoko al la Diplomatoj*, 1915. De T. W. Wilson aperis *La Fina Batalilo*, 1916. E. Privat verkis *Ĉe l'Koro de Eŭropo*, 1909. En 1924 aperis la *Paneŭropa Manifesto* de Coudenhove-Kalergi (tr. E. Sós) kaj la verko de F. S. Nitti *Eŭropo ĉe la Abismo* (tr. R. Kreuz). En 1928 la tiama itala faŝista registaro eldonis *La Laborĉarto. La Tri Principoj de Popolo*, de Sun jatsen, aperis en 1930 (tr. Sinpak). La konata cionista verko de Th. Herzl, *La Juda Ŝtato* (tr.

B. Selzer) estis publikigita en 1934. Originalan verkon pri interŝtataj problemoj verkis E. Privat: *Interpopola Konduto*, 1935. Post la milito aperis en traduko de Stellan Engholm la verko de Grafo Bernadotte *La Fino*, 1945. Valora estas la originalaĵo de Ivo Lapenna: *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo*, 1952. Alia grava originalaĵo estas la verko de E. Privat *Federala Sperto*, 1958: komparo inter la Ligo de Nacioj, Svisio kaj Usono. En 1967 aperis en Germana Demokratia Respubliko *La Germana Popolo kaj la Unuiĝintaj Nacioj*.

Post la mondmilito aperis, dank' al la financa subteno de la koncernaj registaroj, aro da bonaj informiloj pri geografio, politiko, ekonomio pri unuopaj ŝtatoj. Kelkaj cetere aperis ankaŭ antaŭ la Dua Mondmilito: i.a. *Gvidlibreto por Japanlando*, 1927.

La postmilitan serion komencis *Faktoj pri Danlando*, 1948. En 1950 aperis *Aspekto de Islando*, de Ingimar Óskarsson. *Faktoj pri Norvegujo* aperis en 1953, *Bulgario* en 1959. Samjare aperis *Pollando. Juĝu mem! (Faktoj pri Ĉeñoslovakio)* havis duan eldonon en 1960. *Faktoj pri Islando* aperis en 1961. En 1964 aperis *Pollando 1944/1964, Faktoj pri Nederlando;* en 1966 la 3-a eldono de *Faktoj pri Germanujo* (FRG), samjare *25 Jaroj de Soveta Litovio*, en 1967 *La Disfloro de Nacia Vivmaniero en Soveta Uzbekistano, La Latvia SSR* kaj *Nederlando, Nacio en Okcidenta Eŭropo*. En 1968 aperis *Bulgario*, de S. Rusinov, kaj en 1969 *Germana Demokratia Respubliko* (bildoj kaj faktoj). En 1970 aperis *Soveta Estonio*, de G. Olevsoo, kaj *Ukraina Soveta Socialisma Respubliko*.

8.3.8 Arto

8.3.8.1 *Arthistorio kaj fotografio.* — En 1913 aperis la interesa libro de Simon *La Vitraĵoj de la Katedralo de Reims* (tr. Laigner). Tamen nur post la Unua Mondmilito la belartaj aperaĵoj iom oftiĝis. Aperis i.a. la verko de István Genthon *La Pentroarto en la Malnova Hungario* (tr. Szilágyi), 1932. En 1933 aperis la valora originalaĵo de Kornfeld kaj Brzekowski: *Pri l' Moderna Arto*. La *Arthistorio* de Antono Hekler (tr. K. Kalocsay) aperis en 1934.

Post la Dua Mondmilito tiu priarta eldonado pludaŭris. Aperis *La Prahistoria Arto* de A. da Silva (tr. J. F. M.), 1947. En 1950 aperis fotolibro: *Helsinki: Lumo kaj Ombro*. En 1952 aperis la bela fotolibro *Skulptaĵoj sur la Vigelandponto*, de Karl Skaer. En 1955 sekvis alia fotolibro de Van Wijk, kun teksto de E. Elias: *Nederlando, Miraklo el la Akvo*. La fotolibro de Sam Waagenaar *Infanoj ne Konas Limojn* aperis en 1961. En 1962 aperis la fotolibro *Varsovio Rekonstruita*. En 1963 aperis la fotolibroj *Moderna Pekino* kaj *El*

Ĉina Fotografia Arto. De Tran van can aperis *Nordvjetnamaj Krokizoj,* 1966, kaj en Ĉinio aperis *Argila Statuaro,* 1968.

8.3.8.2 *Muziko.* — Ekzistas multnombraj internaciaj kaj naciaj kantlibroj, pri kiuj oni trovas mencion en la koncernaj ĉapitroj. Pri la muzikskribo ekzistas du teknikaj verkoj: *Principoj de la Racia Muzikskribo* de Wójcik kaj Zalewski, 1963, kaj *Lernolibro de Muzilo* (nova muzikskribsistemo), de H. Paruzel, 1964.

8.3.9 Kuirarto

En 1971 aperis la verko de J. Shorter-Eyck *La Internacia Kuirlibro.*

8.3.10 Filatelo

Katalogo pri Esperanto-Poŝtmarkoj estis kunmetita de Vladimír Váňa en 1967.

Sed senkompare pli impona estas luksa katalogo *Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko,* 1959.

8.3.11 Stenografio

La unua provo de Esperanta stenografio estis la lernolibro laŭ la sistemo *Brauns,* aperigita de Per Ahlberg en 1899. La plej gravaj sistemoj naciaj kaj internaciaj estas reprezentataj. I.a. aperis lernolibroj laŭ la sistemoj:

Pitman: lernolibro de Butler (2-a eld. 1914).

Duployé: 1914, 1924, 1933, 1936 (plej grava: la lernolibro de Flageul).

Intersteno: lernolibro de F. de Kunovski: 1927. Aliaj lernolibroj en 1930 kaj en 1954.

Stolze-Schrey: 1904, 1906, 1926, 1932 (gravaj estas la lernolibroj de Schneeberger kaj Stark).

Gabelsberger: 1907, 1910, 1922 (gravaj lernolibroj de Christoffel kaj de Schramm).

Aimé-Paris: lernolibro de A. Schild en 1933. En 1921 lernolibro de Lefebvre.

Unesteno: Lernolibro de Sturzenegger-Matzinger en 1965.

Aperis ankaŭ lernolibroj de sistemoj malpli konataj aŭ rekte elpensitaj por Esperanto: *L'Espero* (de Ch. Barit, 1908); de Roller; de Scheithauer; *Aoro* (de Surotte, 1911); *Ispografio* (de Hamann); *Mondografio* (de Mayr); *Rapido* (de Wallon, 1927); *Radnai* (de Kökény, 1928).

8.3.12 Biografioj

8.3.12.1 *Biografiaj Verkoj pri Esperantistoj.* — L. L. Zamenhof estas priskribita en pluraj libroj. La unua, kaj unu el la plej legataj, estas *Vivo de Zamenhof* de E. Privat, 1920. El klasa vidpunkto aperis ankaŭ la verko de E. Drezen *Zamenhof*, 1929 (represoj en 1968 kaj en 1970). Pli nova estas *Doktoro Esperanto*, de Maria Ziółkowska (tr. Isaj Dratwer), 1959. La plej nova, kaj verŝajne ankaŭ la plej kompleta, estas *Zamenhof*, de Marjorie Boulton, 1963.

El gravuloj de la Esperanto-Movado kaj verkistoj, aperis *Carlo Bourlet*, 1914. En 1947 venis monografio de Ismael Gomes Braga *Monumento al Carlo Bourlet*. De John Merchant aperis *Joseph Rhodes* (tr. Louise Briggs), 1925. Pri Kalocsay kaj Baghy aperis artikoloj en *Arĝenta Duopo*, 1937, kaj en *Ora Duopo*, 1966. Pri Grabowski kaj Kabe (Kazimierz Bein) troviĝas notoj en la verko de Julius Glück *El la Klasika Periodo de Esperanto*, 1937. Eduard Stettler verkis pri *Hector Hodler*, 1928; J. Strönne pri *Duona Jarcento kune kun Paul Nylén* (kun biografio kaj ikonografio), 1942; Fr. Christaller pri *Paul Gottfried Christaller*, 1951; N. G. Hoen pri *Emile Peltier*, 1963. De M. Blicher aperis *El Mia Esperantista Vivo*, 1967. Hukuta masao kompilis *Pioniroj de Japana Esperanto-Movado*, 1967. En 1971 aperis biografio pri preskaŭ forgesita pioniro: *Wilhelm Heinrich Trompeter*, de Adolf Holzhaus.

8.3.12.2 *Biografiaj Verkoj pri Filozofoj kaj Pensuloj.* — De Jan Novák aperis *Jan Amos Komenský*, 1921. De Agostinho da Silva aperis *Vivo kaj Morto de Sokrato* (tr. M.F.), 1946. De A. Grigorov aperis *Lev Tolstoj kaj la Universala Vero*, 1927. B. C. Chaudhuri verkis *Tagore kaj Whitman*, 1961.

8.2.12.3 *Biografiaj Verkoj pri Beletristoj kaj Artistoj.* — G. Chavet verkis pri *Domeniko Theotokopuli (El Greco)*, 1910; V. Dufeutrel pri *Velázquez*, samjare. La vivon de *A. Dürer* pritraktas du verkoj, de F. Nüchter (1911) kaj de H. Koch (1924). Aliaj biografioj sur tiu kampo estas: *Giovanni Segantini* de Ernest Marriott (tr. R. Marriott), 1932; *Rembrandt* de M. Müller, 1936; *Vivo de Pissarro* de Ludovic Rodó, 1948; *Vivo kaj Arto de Goya* de A. da Silva (tr. V. Mendes), 1947; *Vivo de Zola* de A. da Silva (tr. M. de Freitas), 1946; *Adam Mickiewicz* de Mieczysław Jastrun, 1955; kaj *Jānis Rainis, Latva Poeto*, 1965.

8.3.12.4 *Biografiaj Verkoj pri Muzikistoj.* — Bennemann verkis pri *Richard Wagner*, 1913, kaj Biernacki pri *Verko de Chopin* (tr. Medrkiewicz), 1936.

8.3.12.5 *Biografiaj Verkoj pri Politikistoj.* — Ekzistas du biografioj, kiuj priskribas la vivon de *Skanderbeg,* la „heroo de Albanio": de Cuk Simoni, 1929, kaj de Kristo Frashëri (tr. G. Muço kaj V. Pistoli), 1967. *Malriĉa Knabo Kiu Gloriĝis* estas la titolo de biografio pri Masaryk, 1930. W. Sieroszewski verkis pri *Marŝalo Józef Piłsudski* (tr. Strelczyk), 1934. Biografia skizo pri *Kropotkin* aperis en 1938. Fernando Nery estas la aŭtoro de la biografio *Rui Barbosa* (tr. J. Joels), pri brazila politikisto. Intiman konon de la portretita personeco montras la originalaĵo de Edmond Privat, *Vivo de Gandhi,* 1967. La personecon de la hinda gvidanto kompetente traktas ankaŭ la libro *Mahatmo Gandhi* de la Brazilano H. Rohden aperinta en 1972. Pri marksistaj politikistoj, aperis i.a. biografio tradukita de Elsudo: *Karl Marx, Vivo kaj Verko,* 1926. Pri Lenin la rikolto estas pli abunda: *Biografio de V. I. Lenin* (tr. Sudano), 2-a eld. 1922; *Nia Gvidanto* (Skizoj pri Lenin) de Stalin kaj Jaroslavskij, 1931; *V. I. Lenin* de Maksim Gorkij, 1969; *Lenin kaj la Revolucia Movado en Latvio* de A. Drizulis, 1969, k.a. Henriëtte Roland-Holst verkis pri *Roza Luksemburg* (tr. Bas Wels), 1949. *Biografio de Tito,* de Vladimir Dedijer, estis tradukita de M. Stuttard, 1954. Pluraj verkoj priskribis la vivon de Ho: *Anekdotoj pri la Vivo de Prezidanto Ho Chi Minh* (de Tram dan tien), 1960; *Memoraĵoj pri Ho Chi Minh,* 1962; *Prezidanto Ho Chi Minh* (de Truong chinh), 1966; *Prezidento Ho Chi Minh,* 1970; kaj *Kun Onklo Ho,* 1972. En 1965 aperis libro pri la vjetnama heroo Nguyen van troi: *Tiel Li Vivis,* de Tran dinh van.

8.3.12.6 *Biografiaj Verkoj pri Sciencistoj kaj Esploristoj.* — De A. Brigole aperis la monografio *Santos-Dumont* (tr. Malheiro), 1945. De A. da Silva aperis *Vivo de Nansen,* 1948. De Jesus Caraça aperis *Galileo Galilei* (tr. M. de Freitas), 1948, kaj de Yardley aperis *Funebra Biografio de Henry George* (tr. J. Reynold), 1952.

8.3.12.7 *Biografiaj Verkoj pri Religie Gravaj Homoj.* — Pri Jesuo Kristo aperis pluraj verkoj. Elstaraj estas tamen la kritika biografio de E. Renan *Vivo de Jesuo* (tr. E. Gasse), 1907, kaj la katolikdevena, artisma *Historio de Kristo* de Giovanni Papini, 1931. De la greka kristan-komunista batalantino Marika Dragona aperis *La Reala Vivo de ... Jesuo Kristo,* 1947. De J. F. Khun aperis *Majstro Jan Hus,* 1904. De Löwe aperis *Vivo de Luther* (kun la *Malgranda Kateĥismo),* 1932. De J. Vezey Strong aperis *Civitano W. Penn* (tr. Bailey), 1911. De Henry van Etten aperis *George Fox,* 1924 (2-a eld. 1948). De Modesto Carolfi aperis du biografioj de *Francisko el Assisi,* 1923 kaj 1927, kaj unu de Antonio de Padova: *La Padova Lilio,* 1926. A. Halbedl verkis pri *Papo Pio la Deka,* 1951.

Sur la kampo de nekristanaj religioj aperis la verko de P. Lakŝmi Narasu: *Budao* (tr. Takeuĉi tookiĉi), 1933. *La Admono kaj Vivo de Reĝo Aŝoko*, 1937, estis tradukita de Okazaki reimu. Samjare aperis la biografio de budhana sanktulo, fondinto de la Zyôdo-sekto: *La Vivo de Sankta Hônen* de Isii mamine (tr. Nisida ryôya). Fine pri la fondinto de bahaismo aperis verko de J. E. Esslemont: *Baha'u'llah kaj la Nova Epoko* (tr. Lidja Zamenhof), 1930.

8.3.12.8 *Sportistoj.* — Aperis la membiografio de Edson Arantes do Nascimiento, fama brazila futbalisto: *Mi estas Pelé* (tr. Fr. Almada), 1971.

8.4 ESENCA BIBLIOGRAFIO

Apliko de Esperanto en sciencaj kaj fakaj periodaĵoj (CED-Dok. E/IV/3). Londono 1965.

Privat, Edmond, *Historio de la lingvo Esperanto*. 2 partoj. Leipzig 1923-27.

Roelofs, W. P., „Enketo pri la uzo de Esperanto en sciencaj kaj teknikaj periodaĵoj". *Scienca Revuo*, vol. 7, 1955, p. 144-151; vol. 10, 1959, p. 105-111.

Steiner, Hugo, *Katalogo ... de IEMW*. Vol. I. Wien 1957.

Stojan, P. E., *Bibliografio de Internacia Lingvo*. Genève 1929.

ĈAPITRO 9

FAKAJ TERMINAROJ

9.1 ĜENERALA PRISKRIBO

9.1.1 La Fakterminologia Lingvoproblemo

Lingvo, kiu povas esprimi ĉion, posedas la rimedojn, necesajn por la esprimo de sciencaj tezoj. Ĉiuj grandaj lingvoj havas fakterminologiajn vortarojn. Ili unuflanke helpas la uzantojn, senpere paroli pri sciencaj problemoj, aliflanke ili utilas ankaŭ al la lingvo mem, riĉigante kaj ampleksigante ĝian komuniko-povon. Cetere, la problemo de fakterminologio ampleksas ankaŭ aliajn aktivaĵojn, kiel la sporton, la hejmajn laborojn, la infanludojn, k.m.a.

9.1.2 Tutmonda Fakterminologia Situacio

Oni kalkulas, ke en 1951 ekzistis proksimume 1.044 internaciaj fakterminaroj, uzantaj 45 lingvojn, i.a. ankaŭ Esperanton.

La Bibliografio de Terminaroj de Unesko, kiu konsideras nur la fakterminarojn aperintajn ekde 1949 (fakte la pli fruaj estas nur parte ankoraŭ valoraj, pro la rapida evoluo de la scienco) indikas 2.491 verkojn pri 263 temoj en 75 lingvoj. 8 fakterminaroj estas esperant-lingvaj (ankaŭ 8 estas en la kimra, dum la kroata prezentas nur 6, la urdua 5 kaj la tamila 3).

9.1.3 Historia Skizo de la Fakterminologio en Esperanto

La unuaj fakterminologiaj provoj aperis inter 1904 kaj 1907. La tiama ISAE transprenis la taskon pretigi ilin, kvankam kompreneble jam tiam, kaj ankaŭ poste, multaj aperis ekster ISAE mem, kiel verkoj de fak-asocioj, fak-grupoj aŭ de individuoj. Post la Dua Mondmilito, en la kadro de la preparlaboroj por la *Suplemento al Plena Vortaro* de G. Waringhien, D-ro K. Dellian iniciatis en 1949 kompletigon de la scienca kaj teknika terminologioj. La *Suplemento* aperis en 1954, ne esence priatentinte tiujn preparlaborojn, kiuj estis siavice eldonitaj memstare kun pluaj prilaboroj pretigitaj de inĝ. Haferkorn kaj D-ro Belinfante en 1956.

En 1950 la Akademio de Esperanto prenis sur sin la taskon prepari provizorajn terminologiojn por novaj sciencoj aŭ por kompletigo de la jam aperintaj terminaroj. En 1958 tiu tasko estis transdonita al la Terminologia Centro de ISAE. Rimarkindas, ke ekzistas pure medicinista terminologia centro, en la kadro de UMEA.

9.1.4 Strukturo de la Terminaroj

Ekzistas tri specoj de terminaroj. Tiuj tri formoj ne estas ekvivalentaj: laŭ la kunmet-maniero, ili celas ion malsaman.

(a) Ekzistas aboco-terminaroj, unu-, du-, aŭ plurlingvaj: Temas pri la plej komuna kunmetsistemo.
(b) Ekzistas aboco-terminaroj kun ofte nur unu ĉeflingvo (en kiu aperas la difino de la terminoj) kaj kun traduko en unu, du aŭ en pluraj aliaj lingvoj.
(c) Ekzistas plurlingvaj terminaroj sistemaj, t.e. ordigitaj laŭ fakoj kaj subfakoj.

9.1.5 Scienca Signifo de la Fakterminologio

La scienca signifo de la terminaroj kuŝas en la fakto, ke termino (koncepto) nova, kun difino trafa, estas la necesa instrumento por la plulaboro en la scienca kampo. Teorie, la riĉigo de la fakvortaro de Esperanto estas tre simpla: ĉar la 15-a regulo de la *Fundamento* permesas la adopton de la necesaj fremdaj — kaj internaciaj — vortoj kun la aldono de Esperantaj finaĵoj gramatikaj. Malfeliĉe, ne estas tiel simple. En *matematiko,* ekz., la internaciformaj vortoj *biliono* kaj *triliono* ne havas la saman signifon en ĉiuj lingvoj, eĉ ne en la brita kaj amerika branĉoj de la angla lingvo. En Novjorko kaj Parizo unu biliono estas mil milionoj, sed en Londono, Berlino, Stokholmo, Moskvo, Romo kaj Buenos Aires, ĝi estas miliono da milionoj.

9 FAKAJ TERMINAROJ

En *anatomio* la oficiala terminologio estas latina, sed multaj popoloj uzas propran nacilingvan, kiu ofte fontas el malnova, nun eksteruza latina terminologio. En *farmakologio* povas ekzisti pluraj latinaj nomoj por la sama substanco, ĉefe se ĝin oni konas de multaj jaroj (laŭ E. Wüster, oni uzas sep diversajn latinajn nomojn por la hidratoj de etila alkoholo). La samo, kvankam ne tiel grandskala, ekzistas en *kemio:* por kelkaj kemiaj komponaĵoj la angla kaj la germana sufiksoj estas *-ide* (resp. *-id),* dum la franca, resp. itala ekvivalento estas *-ure* (resp. *-uro).* Tiel: germ. *Chlorid, Cyanid, Jodid* estas tradukataj italen per *cloruro, cianuro, ioduro.*

Tasko de la Esperantaj terminaroj do ne povas esti tutsimple kaj senelekte enkonduki novajn radikojn. Ili male celas la normigon de la formo kaj de la semantika enhavo de la terminoj. En tiu maniero Esperanto povos utili kiel scienca pontolingvo por terminologio. Pri la problemoj de scienca terminologia normigo plej bone informas la verko de E. Drezen *Pri Problemo de Internaciigo de Science-Teknika Terminaro,* tr. Samojlenko, 1935, kaj la verko de Eugen Wüster *Konturoj de la Lingvonormigo en la Tekniko,* tr. E. Pfeffer, 1936.

Terminaroj ekzistas por la jenaj fakoj:

Aeronaŭtiko, aktuaristiko, alpinismo, anatomio, arkitekturo, astronomio, aŭtomobilismo, brulŝirmado, botaniko, elektrotekniko (pluraj), etimologio, farmacio, fervojaj aferoj, filatelo, filozofio, fitopatologio, fiziko, fotografado, gastronomio, geografio, geologio, grundoscienco, hortikulturo, juro, kemio, komerco, kongresorganizado, konstruado, kudro kaj triko, logiko, ludoj, lumigoscienco, mekaniko, matematiko, medicino, meteologio, metalurgio, metioj, mikologio, mikroskopio, militistaj aferoj (armeo), muziko, navigado (maristaj aferoj), ornitologio, pacismo, pedagogio, poŝto kaj telegrafio, peltkomercaj problemoj, psikologio, radiofonio, religio, scienco kaj tekniko, skoltismo, sporto, statistiko, ŝuindustriaj aferoj, taŭrobatalo, teknologio, turismo, zoologio.

Fakvortara situacio en Esperanto ĝis 1964 (interkrampe: ĝis 1949):

Ĝis 1964 (1949) ekzistis 127 (106) fakvortaroj por 50 (43) sciencaj brancoj, kiuj uzas Esperanton. El ili,

5 havas pli ol 300 paĝojn,
10 (8) havas inter 200 kaj 300 pĝ.,
13 (12) havas inter 100 kaj 200 pĝ.,
8 (7) havas inter 75 kaj 100 pĝ.

La ceteraj havas malpli ol 75 paĝojn.

La superrigardo ne estus kompleta, se ni ne aldonus, ke multaj, ankaŭ gravaj, terminologiaj provoj aperis en revuoj, precipe en *Scienca Revuo.*

9.2. KATALOGO DE ĈEFAJ TERMINAROJ

Ĝenerala Fakterminologio

— Enciklopedia Vortareto Esperanta (Ch. Verax), 1910: Eo F
— Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana, A-Kor (E. Wüster), 1923: Eo D
— Plena Vortaro de Esperanto (E. Grosjean-Maupin k.a.), 1930; 2-a eld. 1934, 8-a eld. 1971
— Enciklopedieto de Kulturaj Vortoj (Kawasaki n.), 2 vol., 1948: Eo Ja
— Suplemento al Plena Vortaro (G. Waringhien), 1954
— Slipara Vortaro (R. Eichholz k.a.), 1968- : Eo En F D
— Plena Ilustrita Vortaro (G. Waringhien), 1970
— Laŭtema Vortaro (A. Hrynkiewicz), 1971: Eo En F Sp
— Inversa Vortaro (K. Schlüter), 1972

Aeronaŭtiko

— Lexique Aéronautique (R. d'Armon), 1913: En F D Sp It Eo
— Aeronaŭtika Terminaro (E. D. Durrant), 1941
— Aeronaŭtika Terminaro (E. D. Durrant, F. Turner), 1948: Sv Eo

Aktuaristiko

— Dictionnaire Actuariel (E. Sós), 1931: Eo D En F

Alpinismo

— Alpinisma fakterminaro kvinlingva, en: Léon Huot-Sordot, *En la Lando de la Blanka Monto* (tr. Noël), 1913: Eo F En D It

Arkitekturo

— Universala Terminologio de la Arkitekturo (F. Azorín), 1933: Eo En F D Sp It Pt

Armeo kaj Militista Fako


— Armea Terminaro (E. D. Durrant), 1940
— Militista Vortareto (L. Bastien), 1955: Eo F En D It

Astronomio

— Astronomia Terminaro (Sekiguĉi n.), 1956: Eo Ja En D F

Aŭtomobilismo

— Aŭta Terminaro (Eyama t.), 1967; 2-a eld. 1969: Eo Ja En / Ja Eo En


ENGLISH—ESPERANTO
CHEMICAL DICTIONARY
(Angla - Esperanta Kemia Vortaro)
by
D. B. DUNCAN, Ph.D., B.Sc.
QUAESTIONARIUM
MEDICUM
EUGEN WÜSTER
MAŜINFAKA
ESPERANTO-VORTARO
PRIELEMENTA
Deutsche Ausgabe
FERDINAND HIRT & SOHN
LEIPZIG, ESPERANTO-FAKO
English
Esperanto
Deutsch
Español
Français
Italiano
Nederlands
Português
Svensk
International Business dictionary in 9 languages
Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj
Internationales Wörterbuch für Handel und Wirtschaft
Diccionario internacional de comercio y economía
Dictionnaire international du commerce et de l'économie
Dizionario internazionale per il commercio e per l'economia
Internationaal woordenboek voor handel en economie
Dicionário internacional de comércio e economia
Internationell ordbok för handel och ekonomi
FILOZOFIA
VORTARO
Juristisches
Wörterbuch
Deutsch—Esperanto
ELEMENTS de
GEOL
ГЕОЛОГИЯ
GEOLOGI
GEOLOGIO
GEOL
en SIX LANGUES
C. ROUSSEAU
POLIGLOTA VADE-MECUM DE
INTERNACIA-FARMACIO
PAUL NEERGAARD
TERMINARO
HORTIKULTURA SESLINGVA
ESPERANTA
ANGLA
DANA
SVEDA
GERMANA
FRANCA
Fervoja
Terminareto

Botaniko kaj Parencaj Sciencoj

— Botanika Klasifiko (L. L. Malmanche), 1935
— Hortikultura Terminaro (P. Neergaard), 1938
— Fitopatologia kaj Mikologia Terminaro (P. Neergaard), 1946: Eo En Da
— Arboj de la Arbaro kaj Kampo (F. Booth), 1947
— Plantpatologiaj kaj Mikologiaj Vortradikoj (P. Neergaard), 1951: Eo En
— Terminaro pri la Ekstera Morfologio de la Florhavaj Plantoj (J. W. Moll), en *Scienca Revuo*, 1958: Eo L

Brulŝirma Fako

— Fajrobrigada Teknika Vortaro (Brulŝirm-Vortaro), 1963: En D F Eo Nl No Sv It Sp Ru Pl Cs Tu

Elektrotekniko

— Elektrotechnische Ausdrücke in Esperanto (E. Wüster), 1923: D Eo
— Elektroteknika Vortaro (Takagi kaj Ooki), 1933: En Eo Ja
— International Electrotechnical Vocabulary. Fundamental Difinitions, 1935: F En D It Sp Eo
— Meĵdunarodnij Elektrotekniĉeskij Slovar', 1936: F Ru En D It Sp Eo
— International Electrotechnical Vocabulary, 1938: F En D It Sp Eo
— Vocabulario Electrotécnico Internacional, 1939: Sp F En D It Eo
La kvar supraj vortaroj estis eldonitaj de Internacia Elektroteknika Komisiono (IEC).
Kiel aneksoj al la 2-a eld. (1954, sen Eo) de la IEC-Vortaro de 1938 aperis:
  — Grupo 05 = Fundamentaj nocioj (ISAE), 1962 (K. Siwicki), 1963: Eo Pl / Pl Eo
  — Grupoj 07 kaj 08 = Elektroniko kaj elektroakustiko (Siwicki), 1965: Pl Eo / Eo Pl En F D It Sv
  — Grupo 10 = Maŝinoj kaj transformiloj (ISAE), 1962 (Siwicki), 1963: Eo Pl /Pl Eo
  — Grupo 12 = Magnetaj transduktoroj (ISAE), 1961
— Elektroteknika Terminaro (S. Alexandersson), 1953: Eo Sv

Etimologio

— Naŭlingva Etimologia Leksikono (L. Bastien), 1907; 2-a eld. 1951: Eo L F It Sp Pt D En Ru

Fervoja Fako

— Eisenbahn-Wörterbuch (G. Habellok), 1923: D Eo
— Prinomado de Vagonoj kaj Vagonpartoj (J. Pollhammer), 1929

— Terminaro de Fervojaj Veturiloj (Nemoto k.), 1939: Ja Eo
— Fervoja Terminaro (E. M. Rosher), 1953
— Fervojteknika Leksikono (Blin kaj Blondeaux), 1955
— Fakvortaro Fervojista, 1954: Eo D / D Eo
— Railway Technical Terms (E. M. Rosher), 1958: En Eo
— Priručnik za Konverzaciju, 1965: 6-lingva
— Fervoja Terminareto (G. Ritterspach), 1966: D Eo / Eo D
— Fervoja Terminareto (I. Bácskai), 1968: Eo Hu / Hu Eo
— Fervoja Terminaro (P. Engen, P. J. Krogstie), 1968: No Eo / Eo No
— Fervoja Terminareto, 1971: Eo Sh / Sh Eo
— Spoorwegvakwoordenboek, 1972: Eo Nl / Nl Eo

Filatelo

— Vocabulaire Français-Esperanto, contenant les mots spéciaux à la philatélie (R. Lemaire), 1903: F Eo
— Tausch-Code (P. A. Artemjew), 1913: D F En Ru Eo
— Alfabeta Tabelo de Filateliaj Fakesprimoj, 1914: D F Sp Eo
— Filatela Terminaro (H. M. Scott), 1928; 2-a eld. 1945: Eo En F D
— Cizojazyčná Korespondence pro Filatelisty (Kucharský), 1962: Eo Cs Ru D F En It Sp Hu

Filozofio

— Filozofia Vortaro (St. Kamarýt), 1934: Eo En Cs F D

Fiziko

— Vortaro de Fiziko (ISAE), en *Scienca Gazeto*, 1913: Eo F En D It
— Mekanikaj Terminoj (Ossaka kaj Takata), 1962: Ja En Eo

Fotografado kaj Optiko

— Elementa Fotografa Optiko (Ch. Verax), 1906
— Vocabulaire Français-Esperanto technologique des termes les plus employés en photographie (Ch. Verax), 1907: F Eo

Gastronomio

— Manĝokarto (I. Tejchfeld), 1911: Eo En F D Pl Ru
— Gastronomia Terminaro (E. Urban), 1958: Eo En Cs F

Geografio

— Mondmapo (IOE), 1968
— Nia Geografia Terminaro (A. Albault), en *Scienca Revuo*, 1968
— Pošatlaso de la Mondo (Kartografie, Praha), 1971

— Kontribuo al Geografia Nomenklaturo en Esperanto (J. Kavka, T. Pumpr), en *Scienca Revuo*, 1972

Geologio

— Éléments de Géologie en six Langues (A. Cailleux k.a.), 1965: D Ru Sp Eo F En

Grundoscienco

— Terminaro, en *El la Polvo de la Tero* (W. F. Rolt), 1969

Infanaj Ludoj

— Terminaro por Infanludoj, 1942; repr. 1961

Juro

— Juristisches Wörterbuch (S. Liebeck), 1931: D Eo
— Leĝa Terminaro (A. Mildwurf), 1946

Kemio kaj Farmacio

— Provo de Khemia Nomigado (P. Berthelot), 1904
— Poliglota Vade-mecum de Internacia Farmacio (C. Rousseau), 1911: L En F D Sp Nl It Ru Sv Eo
— Esperanta Nomenklaturo de Kemio (ISAE), 1913: Eo F En D It Sp
— Nomenclature Pharmaceutique, 1922: L Eo F
— Leksikono de Ĥemio kaj Farmacio (Hermesa Rondeto), 3 vol., 1927-29: Ja Eo
— Koloidkemia Terminaro (Maeda t.), 1929: Eo D En F
— Seslingva Vortareto de Medikamentoj (Hermesa Rondeto), 1930: Eo La Ja D En F
— Kemia Terminaro (K. Dellian), 1948: D Eo
— English-Esperanto Chemical Dictionary (D. R. Duncan), 1956: En Eo
— Kemiaj Afiksoj Internaciaj (J. Pióro), 1966
— Neorganikaj kaj Organikaj Kombinaĵoj (J. Pióro), 1970
— Fermentoj (J. Pióro), 1970

Komerco

— Terminoj uzataj en komerco pri peltoj, 1921
— Handelstermen (J. Eiselin), 1925: Nl Eo
— Common Commercial Terms, 1926: En Eo
— Komerca Vortaro Seslingva (R. Kreuz), 1927: D En F It Sp Eo
— Komerca Vortaro en Esperanto (R. Kreuz, A. Mazzolini), 1927

— Varolisto en Esperanto (R. Kreuz, O. Schutkowski), 1927: Eo D F En Sp It
— Internacia Komerc-Ekonomika Vortaro (F. Munniksma), 1974: En Eo D Sp F It Nl Pt Sv

Komunikado

— Provo de Teknika Vortaro por Poŝto kaj Telegrafo (A. Behrendt), 1911: D F En Eo
— Code International Lugagne (G. Lugagne), 1914: F En Pt Sp D It Eo
— A Polyglot Collection of Postal Terms (J. Wirkberg), 1924
— Poŝt-Telekomunika Vortaro (R. Filliâtre), 1934

Kongresa Fako

— Glossario dei Congressi: Eo En F D It

Konstrutekniko

— Sägenwörterbuch (H. J. Plehn), 1934· D En F It Eo
— Ĉarpentiloj (E. M. Rosher), 1950
— Lignaj Juntoj Ilustritaj (Rosher), 1952; 2-a eld. 1959
— Konstruteknika Terminaro (K. J. Moberg), 1958: Sv Eo
— Ĉarpentiloj Ilustritaj (Rosher), 1959
— Teknika Terminaro pri Ŝoseoj kaj Pontoj (A. Broise), 1959

Kudra kaj Trika Fakoj

— Kudra kaj Trika Terminaro (M. kaj V. Verda), 1947; 2-a eld. 1961

Lumigado

— Glühlampen und Bogenlampen (W. Velten), 1907: D Eo
— Benamingen op het Gebied der Verlichtingskunde, 1938; 2-a eld. 1941: Nl D En F Eo

Marista Fako

— Provo de Marista Terminaro (M. Rollet-de-l'Isle), 1908: Eo En D F Sp It Nl
— Marista Terminaro (P. Clissold), 1950: Eo En F D Sp

Matematiko

— Matematika Terminaro kaj Krestomatio (R. Bricard), 1905
— Vortaro de Matematiko (ISAE), en *Scienca Gazeto*, 1913: Eo F En D It
— Matematika Terminaro (C. M. Bean), 1954

— Kelkaj Konsideroj pri Matematikaj Terminoj en Esperanto (O. Reiersøl), 1963
— Plurlingva Matematika Terminaro (O. Reiersøl), 1963: Eo En D F Sp It

Medicino kaj Parencaj Sciencoj

— Anatomia Vortaro Kvarlingva (Ch. Bouchard k.a.), 1906: L F En Eo
— Latino-Esperanta-Japana Anatomia Terminaro (Ošida kaj Sata), 1922; 2-a eld. 1924
— Seslingva Vortareto de Medikamentoj laŭ Japana Farmakopeo (Hermesa Rondeto), 1930: Eo L Ja D En F
— Esperanta Teknika Medicina Vortaro (M. Briquet), 1932: Eo L En F D It Sp
— Quaestionarium Medicum (F. Meyboom), 1961: 17-lingva
— Vortoj Uzataj en Medicino (Kato s.), 1962
— Terminaro oftalmologia, en *Lernolibro de Oftalmologio* (Kato s.) 2-a eld. 1963

Metalologio

— Terminaro pri la Kovrado de Metaloj (J. A. McCarthy), 1964: Eo En / En Eo

Meteologio

— Lexique Météorologique en 12 Langues (E. Delcambre, M. Rollet-de-l'Isle), 1931: F Cs D Sp En Eo It Pt Ru Pl Ro ?
— Meteologia Terminaro (M. Lewin), 1961

Mikroskopio

— Terminaro pri Mikroskopio kun Krestomatio (E. Balech), 1966: Eo En D F Sp

Muziko

— Muzika Terminaro (F. de Ménil), 1908
— Muzika Terminaro (M. C. Butler kaj F. Merrick), 1944; 2-a eld. 1961: Eo (En D F)
— Esperanto-lingva Muzika Leksikono (J. B. Briano), 1972: Eo It / It Eo

Pacifismo

— Teknika pacisma terminaro, en *Historio Resuma de l'Arbitracio Konstanta* (G. Moch), 1905

9 FAKAJ TERMINAROJ

Pedagogio kaj Psikologio

— Teknika Vortareto de Pedagogio, Logiko kaj Psikologio (P. Trarbach), 1925: Eo D F En
— Terminaro Pedagogia kaj Psikologia (P. Bennemann), 1934: Eo D En F
— Lerneja Esprimaro Esperanta (I. Nagy), 1966: Eo Hu

Radio

— English-Esperanto Radio Dictionary (H. Epton), 1924: En Eo
— Radiotechnisches Wörterbuch, 1924: En F D Sp It Eo
— Radio-Vortaro (P. Christaller), 1924: Eo D
— A Short Dictionary of Radio Terms (H. Epton), en *International Radio-Manual*, 1925: Eo En
— Radio-Lexic (G. Malgorn), 1925: F En D It Sp Eo
— Radio Ordbok (R. Bugge-Paulsen), 1926: No Eo En
— Radio-Esperanto (G. Demidjuk), 1926: Ru Eo
— Radio-Terminaro (W. Schattat), 1926: D Eo
— Radio Amaterský Slovník (O. Ginz), 1927: Cs Eo D F En
— Vocabulaire de Radiotechnique en 6 langues (M. Adam), 1940
— Radio-Terminaro (A. Venture), 1943; 2-a eld. 1960
— Ham's Interpreter (radio-amatora terminaro), 1966: 10-lingva

Religio, Teologio

— Religioj, Ordenoj kaj Sektoj. Provo de Internacilingva Nomigado kaj Difino (H. Jakob), 1928
— Budhisma Fakvortareto laŭ la Vortaro de Palilingvo (Takeuĉi t.), 1933
— Cursus Completus Esperanti (J. Bianchini), 1934: Eo L
— Propraj Nomoj de Sanktuloj kaj Sanktulinoj (katolika), 1962: L Eo
— Budhisma Terminaro (V. Sadler), 1962
— Katolika Terminaro (W. Flammer), 1963: D Eo
— Kristana-Evangelia Terminaro (E. Quentin), 1963
— Propraj Nomoj en la Nova Testamento (H. G. Wannemakers), 1963: L Eo
— Katolika Terminaro (H. G. Wannemakers kaj Huberteno), 1963: Eo L
— Katolika Terminaro (J. M. Claramunt), 1964: Eo Sp
— Katolika Terminaro (H. Roosen), 1965: Eo Nl
— Katolika Terminaro por Japanoj (A. Matubara), 1966
— Katolika Terminaro (Roosen kaj Wannemakers), 1972: Nl Eo

Rotario

— A Rotary Phrasebook, 1970: En F D Sp It Nl Pt Eo

Ruĝa Kruco

— Esperanto et Croix-Rouge (Bayol), 1906: F Eo
(aperis ankaŭ eldonoj por Germanoj, 1908, kaj Rusoj, 1909)
— Esperanto-Gvidilo por la Ruĝa Kruco, 1908-10: aperis po unu broŝuro por la lingvoj En F D Ru Da Sp It Pt Sv
— Wörterbuch für das Rote Kreuz (F. Uhlmann), 1913: D Eo

Scienco (ĝenerala), Teknika kaj Teknologia Terminologio

— Tabelo da Vortoj Fakaj, Sciencaj kaj Teknikaj (P. Fruictier), 1904: Eo F En D
— Vocabulaire Technique et Technologique (Ch. Verax), 1907: F Eo
— Maŝinfaka Esperanto-Vortaro Prielementa (E. Wüster), 1923: Eo D / D Eo
— Scienca Fundamenta Esperanta Terminaro (M. Rollet-de-l'Isle), 1931: Eo F
— Scienca kaj Teknika Terminaro (K. Dellian, R. Haferkorn, F. J. Belinfante), 1956: Eo D En F
— Ĝustigoj al STT (R. Haferkorn), 1961
— Technisches Wörterbuch (R. Haferkorn), 1967: D Eo (Eo D)
— Il-maŝina Nomenklaturo en ses Lingvoj (E. M. Rosher), 1968

Skoltismo kaj Tendumado

— Skolta kaj Tenduma Terminaro (J. K. Hammer), 1963

Sporto

— La Sporta Lingvo en Esperanto (T. Ujlaky-Nagy), 1972
— Esperanto: Lingvo de la Sporto (R. Harry), 1972: D Eo En

Statistiko

— Terminaro, en *Sinopse Estatística do Brasil*, 1947: Pt Eo

Ŝuindustrio

— Vortaro pri Botoj kaj Ŝuoj (E. E. Yelland), 1951: 6-lingva
— The Shoeman's Foreign Terms (Wright), 3-a eld. 1962: En F D Sp It Sv Nl Eo

Taŭrobatalo

— Teknika Leksikono de Toromakio (L. Carles), 1909

Turismo

— Esperanta Frazlibro de l' Turisto (Merckens, Cart, Fruictier), 1903-04: En F D Sp It Eo

— Turista Vortaro (A. Pechan), 1968: Eo Hu / Hu Eo

Zoologio

— Provo de Esperanta Nomigado por la Zoologio (De Givry, Ch. Verax), en *Internacia Scienca Revuo*, 1908: L Eo
— Ornitologia Vortaro Oklingva de Birdoj Eŭropaj (P. E. Stojan), 1911: L D En Eo F It Pl Ru
— Tiernamen (A. Macho), 1931: D Eo / Eo D
— Nomaro de Svedaj Birdoj (B. Gerdman), 1953: Sv L Eo
— Bildlibro pri Bestoj (W. A. Gething), 1961
— Komunlingva Nomaro de Eŭropaj Birdoj (ORE), 1971: L Eo

9.3 ESENCA BIBLIOGRAFIO

Bibliografio de matematikaj kaj natursciencaj terminaroj en Esperanto (CED-Dok. E/V/4). Rotterdam 1972.

Drezen, E., *Pri problemo de internaciigo de science-teknika terminaro*. Trad. A. Samojlenko. Moskvo-Amsterdam 1935.

Haferkorn, R., *Sciencaj, teknikaj kaj aliaj fakvortaroj en Esperanto* (CED-Dok. E/V/1). Londono 1962.

—, . . . *Aldono* (CED-Dok. E/V/2). Londono 1964.

ISAE, „Kion niaj fakvortaristoj devas atenti? Laborplano . . . ." *Scienca Revuo*, vol. 15, 1965, n-ro 1/2, p. 7-22; vol. 16, 1966, n-ro 3/4, p. 73-74.

Neergaard, Paul, „Rimarkoj pri kelkaj terminologiaj principoj". *Scienca Revuo*, vol. 7, 1955, n-ro 26, p. 43-57.

Solzbacher, William, „Technical vocabularies in Esperanto". *Amerika Esperantisto*, vol. 63, 1949, n-ro 7/8, p. 97-120.

UNESCO, *Bibliography of interlingual scientific and technical dictionaries*. 5-a eld. Paris 1970.

Werner, Fritz Cl., „Das Sprachenproblem in der biologischen Terminologie". *La Monda Lingvo-Problemo*, vol. 3, 1971, n-ro 8, p. 101-109.

Wüster, Eugen, *Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik*. Berlin 1931. 3-a eld. Bonn 1970. — Rusa traduko: Moskva 1935.

—, *Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko*. Trad. E. Pfeffer. Budapest 1936.

—, „Die internationale Terminologie im Dienste der Informatik". *La Monda Lingvo-Problemo*, vol. 2, 1971, n-ro 6, p. 138-144.

ĈAPITRO 10

PERIODAĴOJ

10.1 PERIODAĴOJ KUN ĜENERALINFORMA ENHAVO

10.1.1 Komenciĝo de la Movado

La unua revuo esperantlingva estis *La Esperantisto,* sub redakto de L. L. Zamenhof, publikigita en Nürnberg inter 1889 kaj 1895 dank' al la financa subteno de L. L. Zamenhof mem, poste al tiu de Trompeter. En 1895 ĝi malaperis pro la cenzura malpermeso eniri la tiaman Rusion (kie loĝis tri kvaronoj de la tuta abonantaro). La dua revuo, mallongviva, nomiĝis *La Mondlingvisto.* Ĝi aperis 1889-1890 en Sofio (Bulgario), sub la redakto de M. S. Bogdanov.

Feliĉe jam en 1895 la torĉo estis relevita de novaperaĵo: la revuo *Lingvo Internacia* (LI). Inter 1895 kaj 1898 ĝin redaktis Paul Nylén, en Svedio, dank' al la financa subteno de la Odesa Ruso Vl. Gernet, kaj post 1898 dank' al la subteno de la Svedo Bäckström. En 1902 la redaktejo migris al Hungario (Budapeŝto), kie la revuo estis eldonata de Paul de Lengyel, kiu en 1904 siavice migris al Parizo. Tie, kun P. Fruictier kaj Th. Cart, li fondis la eldonfirmon Presa Esperantista Societo. Redaktoro de LI inter 1907 kaj 1914 estis Prof. Th. Cart. La revuo LI ne havis nur propagandan kaj ĝeneralinteresajn flankojn: ĝi flegis ankaŭ literaturon. Aperis originalaj poemoj de Devjatnin, Langlet, Zeidtlitz, Kofman, Lojko, Boguŝeviĉ; kaj tradukoj de L. L. Zamenhof, Seleznev, Dombrovski, Goldberg, Naumann, Solovjev, Postnikov; originalaĵoj de Waśniewski, Ŝirjaev, De Lengyel, Ahlberg, Langlet, Nylén, Abesgus, Boguŝeviĉ, Vl. Gernet, k.m.a. Parto el la poemoj aperintaj en LI estis kolektitaj en *Fundamenta Krestomatio* (1903).



La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache.

Herausgegeben unter der Mitwirkung des **Dr. Esperanto** (Dr. L. Samenhof) von **Chr. Schmidt**, Vorstand des Weltsprachevereins in Nürnberg.

Erscheint monatlich einmal.

Zu bestellen auf der Post und in der Buchhandlung von Heerdegen-Barbeck in Nürnberg.

Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Sub la kunlaborado de **Dr. Esperanto** (Dr. L. Zamenhof) eldonata de **Chr. Schmidt**, prezidanto de la klubo mondlingva en Nürnberg.

Eliras unu fojon en la monato.

Oni povas aboni sur la posto kaj en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nürnberg.

La titolo de la unua numero de *La Esperantisto* el 1889:
La Movado ne kreis la gazetaron, sed la gazetaro kunkreis la Movadon.



Teo Jung: La unua nomo en la eldonado de la esperantlingvaj periodaĵoj.

La revuo *Esperanto* de UEA: Preskaŭ sep jardekojn inter la plej vaste legataj periodaĵoj en la Internacia Lingvo.



10.1 PERIODAĴOJ KUN ĜENERALINFORMA ENHAVO

En 1898 ekaperis la revuo de L. de Beaufront *L'Espérantiste*, dulingva (Esperanto kaj franca), dediĉita al la disvastigo kaj defendo de Esperanto. Kunlaboris per tradukoj *(Fantomoj* de Korolenko) Vl. Gernet, aperis novelo de Kofman, kaj kontribuaĵoj de L. de Makay, Postnikov, René Lemaire, Evidino (pseŭdonimo de Jeanne Ranfaing Zabilon-d'Her), P. de Lengyel, k.a. *L'Espérantiste* malaperis en 1908, kiam De Beaufront forlasis la Movadon.

10.1.2 Ĝis la Unua Mondmilito

En 1905 ekaperis la revuo *Esperanto*, kiun baldaŭ aĉetis Hector Hodler kaj kiu en 1908 iĝis oficiala organo de UEA (en Ĝenevo). Por la informado pri la eventoj en la LK, en la Akademio, en la tiama Centra Oficejo de Generalo Sebert (Parizo), en la KKK, aperis inter 1908 kaj 1922 la *Oficiala Gazeto Esperantista* (Parizo).

La junularan revuon *Juna Esperantisto* redaktis Privat kaj Hodler (1903-09) kaj poste De Lengyel kaj Royer (191C-14).

10.1.3 La Intermilita Epoko

Pluaperis kompreneble la UEA-revuo *Esperanto* (en Ĝenevo), kiu daŭris ĝis 1942, sed postmilite tuj reviviĝis. Inter 1936 kaj 1947 aperis ankaŭ *Esperanto Internacia,* organo de IEL (Londono).

Inter 1920 kaj 1925, en Horrem apud Kolonjo (Germanio), aperis *Esperanto Triumfonta,* sendependa, neŭtrala informilo por la Esperanto-Movado, eldonata kaj redaktata de Teo Jung. La revuo, tuj tre sukcesa, ricevis en 1925 la titolon *Heroldo de Esperanto,* kaj aperis dum kelkaj jaroj eĉ semajne. En 1936 la redaktejo migris al Scheveningen (Nederlando), sed la gazeto devis ĉesi aperi en 1940. En 1932 naskiĝis alia tre ŝatata revuo: *La Praktiko,* unue eldonaĵo de Cseh-Instituto en Hago (Nederlando), postmilite de Universala Ligo kaj laste de UEA. Por gejunuloj aperis inter 1920 kaj 1924 *Esperantista Junularo* (red. A. Robin), daŭrigita de Neupert inter 1924 kaj 1928. Alia periodaĵo, *La Juna Vivo,* aperis ekde 1934.

10.1.4 Post la Dua Mondmilito

Hodiaŭ ĝenerale primovadaj estas sep revuoj. I.a. *Esperanto* de UEA (Rotterdam), *Heroldo de Esperanto* (kiu ree aperas ekde 1946, kaj nun kun redaktejo en Bruselo). Ĝi estas dusemajna varienhava, sed ĉefe primovada periodaĵo. Mortintaj estas *La Praktiko* (1932-70),


Svisa Espero
La Revuo Orienta
エスペラント
7
magazin
NYELV ES VILÁG
La Espero
The British Esperantist
AUSTRIA
ESPERANTO REVUO
Sonorilo
The Australian Esperantist
Esperanto-Revu
GERMANA
ESPERANTO-
The NORTH AMERICAN
ESPERANTO REVIEW
ESPERANTO-BULTENO
ESPEDANTA
FINNLANDO
BRAZILA
ESPERANTISTO
starto
REVUE
FRANCAISE
FRANCA
LA
SUDA
STELO
l'Esperanto
der esperantist
LA ONDO DE ESPERANTO
ВОЛНА ЭСПЕРАНТО
KOMUNA
ESPERANTO
GAZETO
Esperanto
EN SKOTLANDO
POLA ESPERANTISTO
ESPERANTYSTA POLSKI

kiu havis ilustritan, popularan enhavon, kaj la organo de la efemera Instituto por Oficialigo de Esperanto en Beograd, *Esperanto-Gazeto* (antaŭe *IOE-Gazeto*, 1966-72).

Aparte altira estas la junulara, sprita kaj modernaspekta revuo *Kontakto*, fondita en 1963 kaj eldonata de la junulara sekcio de UEA, TEJO.

10.2 ĈEFAJ LANDAJ ORGANOJ

10.2.1 Historia Skizo

Unu el la unuaj landaj organoj estis *Holanda Pioniro* (1902-1921). Sekvis multaj aliaj: *Belga Sonorilo* (1902-1908, kiun ekde 1908 anstataŭis la ĝisnuna *Sonorilo); Svisa Espero* ekaperis en Svisio jam en 1903 kaj daŭras ĝis hodiaŭ. En Hispanio en 1903-1927 aperis *Suno Hispana*, sed ekzistis aliaj, i.a. *Hispana Revuo* (1908-1913) kaj *Hispana Esperantisto* (1917-1923).

En 1905 aperis du gravaj organoj: *The British Esperantist*, kiu iĝis interesa kaj valora, ĝis nun ekzistanta revuo, kaj *Germana Esperantisto*, altnivela revuo, kiu malfeliĉe malaperis en 1935 pro la Hitlera malpermeso.

En 1906 estis fondita la sveda *La Espero*, kiu ekzistas ankoraŭ hodiaŭ. *Brazila Esperantisto* aperis la unuan fojon en 1907, kaj vivas ĝis nun. Ankaŭ *American Esperanto Magazine* naskiĝis en 1906 kaj vivis ĝis 1965. En 1908 aperis la unua numero de *Pola Esperantisto*, kiu, kun kelkaj intervaloj, aperas ĝis hodiaŭ. Samjare venis la unua numero de alia ĝis hodiaŭ regule aperanta revuo. Temas pri *Franca Esperantisto*, kiu anstataŭis la iaman *L'Espérantiste*. Ĝi ĉesis post 1912, reaperis en 1920/21, sed denove paŭzis ĝis 1933. Dume la organo de la francaj esperantistoj estis *La Movado*. Kun escepto de la militaj jaroj, poste regule aperadis *Franca Esperantisto*.

Hungara Esperantisto debutis en 1909. *Kataluna Esperantisto* aperis inter 1910 kaj 1928. La itala *L'Esperanto*, tiam sub alia nomo, ekaperis en 1913. La tri naciaj organoj, ĉiuj ankoraŭ ekzistantaj, *Argentina Esperantisto, Esperanta Finnlando* kaj *Bulgara Esperantisto* naskiĝis respektive en 1917, 1920 kaj 1919. En 1919 ekaperis ankaŭ ekstremorienta revuo: la japana *La Revuo Orienta*, kiu aperas ĝis hodiaŭ.

Post la Unua Mondmilito, krom la menciitaj, aperis kelkaj pliaj: post la malapero de *Holanda Pioniro* en 1921, aperis *Holanda Esperantisto* (1922-1924 kaj 1926-1931), *Esperanto-Pioniro* (1925-1928) kaj *Nederlanda Esperantisto* (iom pli longviva: 1932-1968). *Dansk*

Esperanto-Blad, organo de CDEL, ekaperis en 1928; *The New Zealand Esperantist*, en 1929; *The Australian Esperantist*, en 1940; kaj *Norvega Esperantisto*, en 1932; ĉiuj ĝis nun.

10.2.2 Hodiaŭa Situacio

Krom la menciitaj periodaĵoj, kiuj ankoraŭ aperas, kelkaj novaj landaj organoj povis intertempe starti. Hodiaŭ la landaj organoj, nenecese oficialaj revuoj de nacia asocio, estas 39. La kalkulo pri la stato de la jaro 1969 indikas, ke ili estas ĝenerale parte nacilingvaj, parte en Esperanto. Elstaras la brita (de 1905), la bulgara (de 1919), la skota (de 1947) kaj la okcidentgermana (de 1948).

Tuj post la Mondmilito ekaperis *Aŭstria Esperanto-Revuo* (1946 ĝis nun). La postan jaron, 1947, aperis la unua numero de la ĝis nun aperanta *Esperanto en Skotlando*, kiu ĝuas pli-malpli regulan kunlaboradon flanke de la verkistoj de la t.n. Skota Skolo. En 1948 ekaperis *Esperanto-Post*, nun nomata *Germana Esperanto-Revuo*, signo de renaskiĝo de la Esperanta vivo en Federacia Respubliko Germanio. En Hispanio povis fine starti en 1949 la ĝis nun aperanta *Boletín. The North American Esperanto Review* (organo de ELNA) ekaperis en 1953, sed estis anstataŭata de *Lumo* (ekde 1962), organo de la kanada landa asocio, kaj de *Newsletter* (ekde 1964), organo de ELNA.

Anstataŭante la tradici-riĉan *La Suda Stelo*, de 1957 ĝis 1963 aperis *Jugoslavia Esperantisto*. Nun denove *La Suda Stelo* estas la organo de la jugoslavia Movado. La esperantistoj en Sudafriko disponas pri *Bona Espero*, ekde 1964. *Der Esperantist* estas la ĉefa Esperanto-revuo en Germana Demokratia Respubliko (1965 ĝis nun). La Nederlandanoj decidis, en 1969, kunigi la fortojn por organo de ĉiuj tendencoj en la nederlanda Movado: *Komuna Esperanto-Gazeto*.

Pluraj landaj junularaj revuetoj ofte aspektas iom modeste, sed prezentis kelkfoje tre altiran enhavon, i.a. *Kial Ne?* (brita, ekde 1959), *Kvinpinto* (sveda, ekde 1960), *Tamen* (pola, 1959-65), *Jen* (usona, ekde 1962), *Impulso* (brazila, ekde 1967), *Koncize* (pluraj l.s., ekde 1967).

10.3 KULTURAJ REVUOJ

10.3.1 Ĝis la Unua Mondmilito

La unua vere grava kultura gazeto estis *La Revuo*, aperinta en Parizo inter 1906 kaj 1914, kaj eldonata de Hachette. Ĉefkunlaborantoj estis L. L. Zamenhof, Carlo Bourlet, kaj multaj aliaj tiutempaj


la nica literatura revuo
BELARTO
INTERNACIA KULTURO
MONDA KULTURO
PROMETEO
SENNACIECA REVUO
LITERATURA FORO
ESPERANTO
JARO 3 DECEMBRO 1972
1922 OKTOBRO
LITERATURA MONDO
LA SUDA STELO
MAIGRANDA REVUO
Praktiko
HUNGARA VIVO 4 1970

eminentuloj: i.a. K. Bein, C. Aymonier, A. Grabowski, E. Privat, H. Hodler, M. Ŝidlovskaja, D-ro Vallienne, Ch. Lambert, Cl. Bicknell, Rektoro Boirac, M. Hankel, F. de Ménil, V. Inglada, Rust, F. Pillath (pseŭdonime: Zanoni), D. Dalmau. *La Revuo* organizis ĉiujare literaturan premi-konkurson.

En Germanio, iom poste, aperis serio de kulture kaj literature altkvalitaj revuoj, kiuj tamen povis ekzisti nur mallonge: *La Bela Mondo* (1908-1909), *Universo* (1909-1912) kaj *La Duonmonata* (1909-1910).

Literature gravaj estis ankaŭ *Danubo* (1910-1912) kaj *La Ondo de Esperanto*, rusa periodaĵo, aperinta inter 1909 kaj 1917. Iom forgesita estas la revuo *Marto*, kiu dum sia ekzisto (1910-14, 1922-33) publikigis multajn gravajn originalajn kontribuaĵojn.

10.3.2 Intermilite

La Revuo Orienta, kies unua numero aperis en 1919, eldonata de Japana Esperanto-Instituto, rolas ĝis nun ankaŭ kiel kultura revuo.

Inter 1919 kaj 1925 aperis la revuo *Literaturo* en Anglio, redaktata de Butler kaj Edmonds.

Sed sendube en tiu periodo la plej influa kaj plej ŝatata kulturliteratura periodaĵo, ankaŭ ligilo inter la membroj de la Budapeŝta Skolo, estis *Literatura Mondo*, kies ĉefredaktoroj estis K. Kalocsay kaj J. Baghy. Kiel multaj el la elstaraj revuoj esperantistaj, ĝi havis malfacilan vivon. La unua serio aperis inter 1922 kaj 1926. La dua inter 1931 kaj 1938. Ĉi tiu lingve, stile kaj kritike eminenta revuo estis dum longaj jaroj la publika debatejo pri literaturaj problemoj, kaj la instiga areno por tradukaj aŭ originalaj verkistoj.

Alia literatura revuo estis *Ondo de Daŭgava*, valora revuo redaktata de la Latvo A. Kažoks (1925-31). En 1925 aperis la unua numero de *Oomoto* (je kiu flankiĝis en 1926-1932 la pariza *Oomoto Internacia*). Fakte, Oomoto estas japana religia movado, sed la kultura signifo de tiu revuo, kiu aperas ĝis nun, estas vere atentinda. Interesa estis ankaŭ *La Suda Stelo* (1932-), kun valora kultura enhavo.

10.3.3 Post la Dua Mondmilito

1942-1952, aperis en la neŭtrala Svedio revueto, aspekte modesta, sed signife grava, redaktata de Stellan Engholm: *Malgranda Revuo*.

Reaperis kelkaj antaŭmilitaj literaturaj kaj kulturaj revuoj: i.a. la japana *La Revuo Orienta*, la japana *Oomoto* (ekde 1950) kaj la buda-

peŝta *Literatura Mondo* (1947 ĝis 1949). *La Suda Stelo*, jugoslavia, reaperis en 1948. En 1961 ĝi kunfandiĝis kun la japana literatura revuo *Prometeo* (1956-1960).

El la novaj revuoj ni rimarkas *Internacia Kulturo*, danublanda literatura revuo (1945-52). Sed la ĝis nun plej sukcesa estas sendube *Norda Prismo* (1955 ĝis nun), unue sub la redakto de F. Szilágyi, nun sub la redakto de W. Auld; ĝi iĝis unu el la plej prestiĝaj literaturaj revuoj, digna posteulo de *Literatura Mondo*.

Inter 1955 kaj 1962 vivis *La Nica Literatura Revuo*, sub la redakto de la Franco G. Waringhien, kun kontribuaĵoj originalaj kaj tradukaj, beletraj kaj literaturkritikaj de preskaŭ ĉiuj plej gravaj verkistoj esperantlingvaj. En 1963 ekaperis *Kajero*, literatura revuo de la japana KLEG (ĝis 1967), kaj la postan jaron, kiel signo de aktivo de la Japana Skolo, ekaperis la revueto *l'Omnibuso. Hungara Vivo*, ekde 1961, rolas kiel rimarkinda literatura kaj kultura revuo esperantlingva.

Ankaŭ UEA provis eldoni propran literaturan gazeton: en 1958, sub la redakto de W. Auld, eliris la unua kajero de *Belarto*, kultura suplemento al *Esperanto* (de UEA, Rotterdam). La dua kajero sekvis en 1961: kunlaboris i.a. W. Auld, J. Francis, P. Thorsen, K. Kalocsay, B. Ragnarsson, J. Kořínek, J. Leser, E. de Kock, J. Grum, R. Bernard, M. Carlsson, I. Lapenna. Poste UEA faris ambician provon: eldoni literaturan gazeton nur por originalaĵoj. En 1962 aperis la unua numero de *Monda Kulturo*. La unuaj 5 numeroj, sub la redakto de W. Auld, proponis nur originalajn verkojn, sed la ceteraj, sub la redakto de A. Albault, malfermis siajn paĝojn ankaŭ al literaturaj tradukaĵoj. Kunlaboris multaj gravaj verkistoj: Albert Samyn, Jana Číchová, H. Vatré, J. Velebit, Jan Filip, S. Szathmári, L. Newell, H. Dresen, C. Conterno, A. Su, Miyamoto masao, I. Calabresi, S. Pragano, F. Szilágyi, H. Rosbach, Willy Smit, Dinwoodie, H. Baupierre, k.a. Malfeliĉe *Monda Kulturo* malaperis en 1966.

En 1958 aperis la unua numero de ankoraŭ nun ekzistanta revuo ĝeneralkleriga: *Kulturaj Kajeroj*, de la franca kultura centro esperantista en Grésillon (Baugé). Plej nova aperaĵo estas *Literatura Foiro*, kies unua numero, aperinta en 1970, sin proponis kiel organon de la itala literatura skolo „La Patrolo". Ĝin redaktas en Milano G. Silfer.

10.4 POLITIKAJ PERIODAĴOJ

10.4.1 Historia Trarigardo

La unuaj signoj de klasa diferenciĝo interne de la Esperanta Movado montriĝis en 1908. Cetere, jam dum la Dua Kongreso kunvenis la „ruĝuloj", sed nur post la Unua Mondmilito, dank' al la granda skuo, kiun donis la rusa revolucio, ili trovis konvenan organizoformon.

Inter 1907 kaj 1920 aperis sinsekve en Parizo, Hago kaj Amsterdamo *Internacia Socia Revuo*, redaktata de Fiblango (ps. de Blangarin), Bruijn kaj Nutters. Estis ankaŭ landaj revuoj: *Arbeiter-Esperantist*, ekde 1910 en Germanio, kaj *Le Travailleur Espérantiste* (*Esperantista Laboristo*) en Parizo, redaktata 1912-1914 de R. Louis, kaj 1919-1921 de E. Adam. En 1911 ekaperis en Ĉeĥio la decide revoluciema-klasbatala revuo *La Kulturo*.

La fondo de SAT alportis restrukturiĝon de la laborista movado. Sub la redakto de E. Adam (Lanti), en 1921 ekaperis *Sennacieca Revuo*. En 1923 ĝi kuniĝis kun la soveta *La Nova Epoko*, kies unua numero estis elirinta en 1922. Inter 1928 kaj 1933 la revuo aperis sub la nomo *La Nova Epoko*, sed poste, ĝis 1939, denove kiel *Sennacieca Revuo*. Aliaj proletaj periodaĵoj estis la organoj de la SAT-opozicio (IPE): *Internaciisto* (ekde 1930) kaj *Sur Posteno* (ekde 1933), kaj la organoj de IAREV: *La Nova Etapo* (1932-33) kaj *Proleta Literaturo* (1934). Neesperantista organizaĵo, Internacio de Socialista Kunbatalo, eldonis de 1929 ĝis 1933 sian organon *ISK*, kies daŭriganto estis *La Kritika Observanto*, 1934-1940.

Ekde 1924 aperas, kun kelkaj intervaloj, ankaŭ alia SAT-periodaĵo: *Sennaciulo*. En 1952 oni komencis la aperigon de ĉiujaraj kajeroj de *Sennacieca Revuo* kun kultura enhavo. Estas ja rimarkinde, ke nek *Sennacieca Revuo* nek *La Nova Epoko* estis nur klasbatalaj periodaĵoj: ili estis ankaŭ kulturaj kaj literaturaj revuoj.

Landaj klasbatalaj organoj en Esperanto aperis en Germanio, Francio, Hungario, Aŭstrio, Svedio, Nederlando, Sovetio kaj aliloke. Parto el ili ekzistas ankoraŭ nun.

Signo de la socia radikiĝo de Esperanto en la nuntempa mondo estas la fakto, ke, dum periodo de socia revolucio aŭ de soci-baza civila milito, aperas ankaŭ esperantlingvaj gazetoj, plej ofte, sed ne ĉiam, efemeraj. Tiun fenomenon ni komencas vidi dum la rusa revolucio, sed ĝi plej bone montriĝas dum la hispana civila milito (1936-1939): multaj lokaj, plejparte mallongvivaj publikigaĵoj respublikanaj aperis. La plej longvivaj estis *Popola Fronto* (Valencia, 1936-1939) kaj *Proleta Voĉo* (Barcelona, 1932-1938). La samon ni konstatas en


NUNTEMPA BULGARIO 11 1969
OKCIDENTGERMAN
REVUO
PACO
Sennaciulo
OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
RIPOZOJ
LA MILITREZISTANTO
Internacia Bulten
Informado
el Vietnamio
POPOLA ĈINIO
人民中國報道
PACO
POR LA PACO
EL POPOLA ĈINIO

Ĉinio. Jam en 1913, en Ŝanhajo, centro de la revolucia movado, aperis bulteno *Ĥina Socialisto*. Poste, dum la krizaj momentoj de la klasbatalo kaj dum la plej akutaj fazoj de la civila kaj kontraŭ-japana militoj, ĉiam unu-du aŭ eĉ pli multaj periodaĵoj prezentis revolucian mesaĝon, ekz. *La Verda Lumo* (1922-33) kaj *La Mondo* (1932-36), ambaŭ en Ŝanhajo, kaj la dummilitaj *Orienta Kuriero* (1938-39), *Voĉoj el Oriento* (1938-40) kaj *Heroldo de Ĉinio* (1939-44). Pluraj maldekstraj revuoj aperis ankaŭ en Japanio, kelkaj el ili neesperantistaj, sed kun esperantlingvaj subtitolo kaj resumo, ekz. *Laborista Movado* kaj *La Scienco Proleta*. Aparte atentinda estis *Verda Utopio* (1920-23).

10.4.2 Hodiaŭa Situacio

Krom la bultenoj de la landaj sekcioj de SAT kaj ĝiaj revuoj *Sennaciulo* kaj *Sennacieca Revuo* aperas pluraj aliaj periodaĵoj, kiuj venas grandparte el la t.n. socialismaj landoj.

El Popola Ĉinio aperis regule inter 1950 kaj 1953, kaj ekde 1957. *Paco*, pacisma organo porsocialista de MEM, estis fondita en 1953. *Nuntempa Bulgario* aperis de 1957 ĝis 1970 (en 1964/65 sub la nomo *Bulgario*). En 1959 aperis la unua numero de *Vjetnamio Antaŭenmarŝas* (ĝis 1963); sekvis ĝin, en 1965, *Informado* de VPEA. Ekde 1961 aperadas la kulture bonega *Hungara Vivo*, kiu cetere malmulte pritraktas politikajn problemojn. *El Japanio* estis la titolo de politika revuo, de kiu eliris 27 numeroj inter 1952 kaj 1954. Krome, menciindas la bulteno *Pacon en Vjetnamio* (1966-70), same el Japanio.

Pri la politiko, kulturo, ekonomio de Federacia Respubliko Germanio informis de 1961 ĝis 1968 *Okcidentgermana Revuo*.

Kontraŭkomunista estas *Lanterno* (en Munkeno 1965-1971). Dum la periodo de la malvarma milito aktivis ĉikampe ankaŭ la usona *American Esperanto Magazine* (1907-1965), organo de EANA.

10.5 FAKAJ PERIODAĴOJ

10.5.1 Ĝeneralaj Trajtoj

En 1969 aperis 34 fakaj esperantlingvaj periodaĵoj, ĉu naciaj, ĉu internaciaj. Ili koncernis pacifismon, virinajn problemojn, gepatrajn problemojn, fervojistojn, ĵurnalistojn, medicinon, sciencon, astronomion, stenografojn, muzikon, turismon, aŭtomobilismon, bibliologion, juron, studentajn aferojn, ktp.

10.5.2 Scienco kaj Tekniko

Inter 1904 kaj 1911 aperis *Internacia Scienca Revuo*, unue eldonata rekte de Hachette, poste de la jus fondita ISAE. Inter 1912 kaj 1914 aperis *Scienca Gazeto*, kiu anstataŭis, kiel oficiala organo de ISAE, sub la redakto de Ch. Verax, la malaperintan ISR. Al ISR kunlaboris multaj famaj homoj: i.a. B. de Courtenay, Becquerel, Berthelot, Bouchard, Förster, H. Poincaré, Sebert, Brouardel, R. de Saussure.

En 1918-19 R. de Saussure, svisa matematikisto, provis lanĉi *La Teknika Revuo*, sed ne sukcesis. En 1922-1923 ree provis starti *Internacia Scienca Revuo*. Ĝin anstataŭis kiel oficiala organo de ISAE *Bulteno de ISAE*, redaktata M. Rollet-de-l'Isle, kiu daŭris de 1926 ĝis la militeksplodo. Fine, post la Dua Mondmilito (ekde 1949) regule aperas la dumonata revuo *Scienca Revuo*.

10.5.3 Fotografia Optiko

Aperis *Foto-Revuo* de Ch. Verax en Parizo, inter 1906 kaj 1909.

10.5.4 Kemio

De 1965 ĝis 1968 en Montevideo aperis la kvalifikite altnivela revuo *Kemio Internacia* (en Montevideo).

10.5.5 Bibliologio

1964-1966, kaj ekde 1968 aperas, unue en Melbourne, poste en Rimini (Italio), la elstara fakrevuo *Biblia Revuo*, por orientalistoj kaj bibliistoj (lingvistoj, filologoj, arkeologoj, religisciencistoj).

10.5.6 Geografio

De 1956 ĝis 1964 aperis la ĝeneralinteresa *Geografia Revuo* (Beograd).

10.5.7 Astronomio kaj Natursciencoj

Ekde 1963 aperas la instruriĉa, popularscienca revuo *Homo kaj Kosmo*, eldonaĵo de la Astronomia Observatorio de Zagreb.

10.5.8 Fervojistaj Aferoj

Ekde 1949 aperas *Internacia Fervojisto*, organo de IFEF, en Löten, Norvegio. Ekzistas krome pluraj landaj fakrevuoj esperantlingvaj pri fervojistaj aferoj.

10.5.9 Juro

Internacia Jura Revuo, en Budapeŝto, estas la organo de IEAJ, ekde 1966.

10.5.10 Ĵurnalismaj Aferoj

La ĵurnalisma fakrevuo *Internacia Ĵurnalisto* aperis la unuan fojon en 1958. Redaktejo troviĝas en Sofio (Bulgario).

10.5.11 Pedagogio

Internacia Pedagogia Revuo aperis unuafoje 1908-1922. Nova serio aperis 1927-1939. Post la Dua Mondmilito, nova serio aperis inter 1956 kaj 1959. Ĝi restartis en 1970.

10.5.12 Medicino


1910-1911 okazis la unua provo eldoni medicinan revuon: *Internacia Medicino*. Post la Unua Mondmilito aperis *Internacia Medicina Revuo* (1923-1925 kaj 1926-1936). Postmilite ekaperis *Medicina Revuo* en 1952, kiu en 1964 ŝanĝis sian titolon al *Medicina Internacia Revuo*. MIR, organo de UMEA (eksa TEKA) estas eldonata en Japanio sub la aŭspicioj de la Instituto de Fiziologio de la Universitato de Ĉiba.


10.5.13 Gepatroj kaj Infanoj

Gepatra Bulteno estas la revuo por la gepatroj, kiuj uzas Esperanton hejme. Por la plej junaj infanoj ekzistas *Kalejdoskopo* (antaŭe *Nia Voĉeto*, ekde 1962) kaj *Planteto* (1963-1969).

10.5.14 Turismo kaj Aŭtomobilismo

Jam en 1951 aperis la unua numero de la internacia naturamika organizo: *La Migranto* (Antwerpen, Belgio). De 1964 ĝis 1970 aperis


la
monda
lingvo-
problemo
socia lingvistika
politika jura
psikologia
ekonomika
mouton


ESPERANTOLOGIO
ENHAVO
EINAR MUNKSGAARD • PUBLISHER • COPENHAGEN


Internacia
Scienca Revuo
GEOGRAFIA REVUO
EDICIJA INTERNACIA REVUO
HOMO KAJ KOSMO
MEDICINA REVUO
INTERNACIA JURA REVUO
BIBLIA REVUO
SCIENCA REVUO
INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO
LA INTERNACIA FERVOJISTO
ORGANO DE I.F.E.F.

la bele ilustrita bulgara turisma revuo *Ripozoj*. Internacia turisma revuo ekaperis en 1969 en Zürich (Svisio): *Turista Mondo*. La aŭtomobilistoj havis ekde 1965 propran revuon: *Aŭto-revuo*. Ambaŭ intertempe ĉesis ekzisti.

10.5.15 Studentaj Aferoj

Ekaperis en 1959 la organo *Studento*.

10.5.16 Kolektantoj

Ekde 1961 aperas *La Kolektanto Internacia*.

10.5.17 Esperantologio, Lingvistiko, Bibliografio

Esperantologia revuo aperis jam inter 1932 kaj 1935: *Lingva Kritiko*, kies ĉefredaktoro estis Stefano La Colla. Sed nur post la Dua Mondmilito la tiukampa eldonado aktiviĝis. 1949-1955 kaj 1959-1961 aperis *Esperantologio*, sub la redakto de P. Neergaard (Danio), kun gravaj kontribuaĵoj de multaj interlingvistoj kaj esperantologoj. Ekde 1950 aperas *Informilo de IEMW*, pri bibliografio. Tre valoraj estas la dokumentoj eldonataj regule ekde 1952 de CED en angla, Esperanto kaj aliaj lingvoj pri demandoj statistikaj, bibliografiaj, organizaj, lingvistikaj koncernantaj Esperanton.

Ekde 1957 apera en FR Germanio (unue en Flensburg, poste en Reinbek) *Interlingvistika Informa Servo*, redaktata de A. Bormann, kun valoraj kontribuaĵoj pri lingvistikaj kaj interlingvistikaj problemoj. Interesa entrepreno estas ankaŭ la bulteno *Fokuso*, kiun eldonas en Svedio Ebbe Vilborg ekde 1967. Ĝi prezentas laŭpove kompletan bibliografion de ĉiuj verkoj (libroj, broŝuroj, artikoloj) pri la internacilingva problemo kaj pri esperantologio. Fine, ekde 1968, aperas en Nederlando altnivela, faka revuo *La Monda Lingvo-Problemo*, redaktata de D-ro V. Sadler, fakte verkita en pluraj etnaj lingvoj, sed kun ampleksaj esperantlingvaj resumoj. La revuo pritraktas la ekonomiajn, sociologiajn kaj lingvistikajn problemojn de la interlingvaj rilatoj. IUEF eldonas de kelkaj jaroj cirkulerojn por filologoj.

10.5.18 Religio kaj Teologio

La du ĉefaj kristanaj revuoj estas *Espero Katolika* (fondita en 1903), organo de IKUE, kaj *Dia Regno* (fondita en 1908), organo de KELI (do evangelia). Protestantoj kaj katolikoj havas multajn aliajn landajn aŭ regionajn Esperantajn organojn: la plej longvivaj estas

la nederlandaj: *Nederlanda Katoliko* aperis la unuan fojon en 1910, dum *Kristana Gazeto* (protestanta) en 1931. El la kristanaj periodaĵoj citindas ankoraŭ la bela *Nova Civito* el Romo (1961-1968) kaj la malgranda *Kvakera Esperantisto* (aperinta unuafoje en 1954, nun redaktata en Bristol, Britio).

El la orientaj religioj elstaras la kulture influa japana *Oomoto* (redaktejo en Kameoka): 1925-32, kaj ekde 1950. *La Budha Lumo* (ekde 1925) fariĝis *Budhana Kuriero* en 1962. Plej nova estas la bulteno *Kosmo,* kiu disvastigas la religian filozofion de la dana Martinus (ekde 1969). El la intermilitaj, nun malaperintaj religiaj periodaĵoj nekristanaj ni rimarkas *Teozofia Espero* (1913-1930).

10.6 RESUMAJ STATISTIKOJ

10.6.1 Historio kaj Ĝeneralaj Faktoj

Laŭ la statistiko en *Bibliografio de Internacia Lingvo,* ĝis 1929 aperis entute 985 periodaĵoj, el kiuj tamen nur 715 havis numerosinsekvon, eĉ nur minimuman.

Laŭ la studo de J. Takács, *Katalogo de la Esperanto-Gazetaro,* ĝis 1934 estis 1.276 Esperantaj periodaĵoj en 459 urboj de 59 landoj.

El ili, 45 havis nur unu kajeron,
448 havis 2-8 kajerojn,
167 havis unu jarkolekton,
330 havis 2-5 jarkolektojn,
152 havis pli ol 5 jarkolektojn.

(Por 134 mankas precizaj informoj pri la nombro de la jarkolektoj.)

10.6.2 Hodiaŭa Situacio

En 1971 la adeptoj de Esperanto povis elekti inter proksimume 110 revuoj kaj periodaĵoj. El ili, nur parto estas tute esperantlingva. Kelkaj periodaĵoj, ĉ. la duono, ne estas presitaj, sed multobligitaj per plej malsamaj teknikoj. La ofteco de aperado varias inter ĉiujaraj kajeroj (Jarlibroj, *Sennacieca Revuo)* kaj duonmonata apero *(Heroldo de Esperanto).* La plej multaj revuoj aperas monate, dumonate kaj kvaronjare.

Se mankas periodaĵoj kun semajna aŭ eĉ taga ofteco, tio ŝuldiĝas al la aparta rolo de Esperanto kiel lingvo de tutmonda kolektivo.[1]

1. Tamen, ekde 1971 aperadas ĉiusemajne la Internacia Inform-Servo *Pilo-Press,* prizorgata de Ludwig Pickel, Nürnberg (FRG).

10 PERIODAĴOJ

UEA elstaras kiel eldonanto de la plej multaj periodaĵoj, samtempe plej gravaj el vidpunkto de la Movado: *Esperanto, Kontakto, La Monda Lingvo-Problemo,* Dokumentoj de CED, *Informfolio* kaj *Novaĵoj* de TEJO kaj aliaj informaj bultenoj, ekz. *Unesko-Novaĵoj.*

10.7 JARLIBROJ KAJ ADRESAROJ

La *Adresaroj* listigis la esperantistojn de la frutempo de la Movado. La unua estis publikigita en 1888 en Varsovio, la lasta aperis en 1908 en Parizo, ĉe Hachette. Poste, estas notindaj pluraj naciskalaj adresaroj kaj biografiaj gvidiloj, i.a. *Albumo de Bulgaraj Esperantistoj.*

La *Jarlibroj* estas tre utilaj helpiloj por orientiĝi en la organiza strukturo de la Esperanto-Movado kaj por studi ĝian historion. Unualoke menciindas la Jarlibroj de UEA (ekde 1908), unue en Ĝenevo, nun en Rotterdam. Dum la skismo de la neŭtrala Movado, IEL eldonis sian propran Jarlibron en Londono. Ankaŭ la membraro de SAT, KELI, IKUE k.a. povas, tamen ne ĉiun jaron, konsulti Jarlibron de sia organizaĵo. Kelkfoje naciaj societoj publikigis *Kalendarojn.*

Ekde la komenco de tiu ĉi jarcento aperadis tre multaj *Kongresaj Libroj,* de la Universalaj Kongresoj, de SAT-Kongresoj, de landaj kaj fakaj kongresoj. Antaŭ kaj tuj post la Dua Mondmilito fojfoje eliris *Kongresaj Gazetoj.*

10.8 ESENCA BIBLIOGRAFIO

Stojan, P. E., *Bibliografio de Internacia Lingvo.* Genève 1929.
Takács, Jozefo, *Katalogo de la Esperanto-Gazetaro.* Jablonné n.Orl. 1934.

TRIA PARTO

EN SERVO DE KULTURAJ INTERŜANĜOJ, PRAKTIKAJ CELOJ KAJ INTERNACIA SOLIDARECO

ĈAPITRO 11

FORMOJ DE KULTURAJ APLIKOJ

11.1 VASTECO DE LA KULTURA KAMPO

Lingvo estas parto de kulturo. Tamen, kiam oni starigas la demandon, ĉu iu lingvo estas kultura aŭ ne, oni pensas pri io tute alia, nome pri ĝia kultura enhavo. Al tia demando oni povas nur respondi, ke lingvo per si mem estas nek kultura, nek nekultura. Nur la kulturaj valoroj, kiujn ĝi entenas, kaj la kulturaj celoj, por kiuj ĝi estas utiligata, donas al la lingvo kulturan karakteron. Aliflanke, ampleksiĝanta uzo de iu lingvo sur kultura kampo necese riĉigas kaj nuancigas ĝin. Sole en tiu senco oni povas paroli pri kultura lingvo.

Pro la kulturaj verkoj kreitaj en ĝi kaj pere de ĝi, Esperanto jam delonge transformiĝis en kulturan lingvon. La Esperanta literaturo, detale pritraktita en la Dua Parto de tiu ĉi libro, estas sendube ĝia plej granda kultura trezoro. Tamen, ĝi ne estas la sola. Ĉirkaŭ ĝi ariĝas tre multnombraj aliaj aplikoj de la lingvo por kulturaj celoj. La spektro estas preskaŭ tiel larĝa, kiel vasta estas la kampo de kulturo.

Efektive, la tuta agado de la organizita Esperanto-Movado, prizorgata unuavice de UEA kaj de la organizaĵoj aŭ unuopuloj apartenantaj al ĝi, estas esence kultura. La laboro direktita al disvastigo de la lingvo, la eldonado de lernolibroj kaj vortaroj, la instruado de Esperanto ĝenerale, la interna vivo de multaj el la Esperanto-organizaĵoj ktp. — ĉio ĉi per si mem signifas grandan kulturan aktivadon en mondaj kadroj. Ekzistas, tamen, kelkaj kulturaj manifestiĝoj, kiuj pro sia elstara signifo, eĉ unikeco en kelkaj aspektoj, meritas apartan konsideron. La plej gravaj el ili estas prezentitaj en la sekvaj sekcioj.

11.2 BELARTAJ KONKURSOJ

11.2.1 Origino kaj Nuna Organizo

Ekde la komenco estis faratai klopodoj riĉigi Esperanto-renkontiĝojn per kultura enhavo, ĉefe per prezentado de teatraĵoj (v. 11.4). Dum la 5-a Universala Kongreso de Esperanto en Barcelono (1909) estis organizitaj la t.n. „Floraj Ludoj", nome konkursoj en diversaj branĉoj de poezio. La iniciatinto estis Prof. Delfí Dalmau en Barcelono. Entute alvenis 42 konkursaĵoj. Interese estas, ke inter la unuaj konkursintoj troviĝis Marie Hankel el Dresdeno, Edmond Privat el Ĝenevo kaj Clarence Bicknell el Bordighera. Iliaj nomoj troviĝas inter la gajnintoj. Post tio sporade okazadis diversaj literaturaj aranĝoj dum la universalaj kongresoj. Tio ĉefe dependis de iniciatoj en la sino de lokaj organizaj komitatoj. Ne ekzistis iaj reguloj, nek kontinueco.

Dum la UK en Bournemouth (1949) la Komitato pritraktis la proponon de Reto Rossetti revivigi la iaman aranĝon de „Floraj Ludoj" kaj decidis principe akcepti ĝin. La Estraro estis komisiita ellabori apartan regularon kaj estrarano I. Lapenna ricevis la taskon plenumi la decidon en kunlaboro kun Reto Rossetti. Dum la printempa kunsido de la Estraro en 1950 la projekto estis akceptita. Tiel ekestis la *Regularo pri la Belartaj Konkursoj de UEA*, kiun la Komitato siavice aprobis kaj poste ankaŭ iom amendis.

Laŭ la nun valida Regularo, la belartaj konkursoj de UEA havas la celon evoluigi la diversajn artobranĉojn en la Internacia Lingvo aŭ pere de ĝi. La konkursoj okazas sub aŭspicio de UEA dum la universalaj kongresoj de Esperanto.

La konkursoj enhavas jenajn branĉojn: (i) poezio originala, (ii) poezia traduka, (iii) prozo originala, (iv) prozo traduka, (v) teatraĵo originala, (vi) teatraĵo traduka. Krome, la Estraro de UEA povas decidi, ke la konkurso rilatu ankaŭ al aliaj artaj branĉoj, ekzemple kantoj, humoraĵoj, desegnaĵoj, amatoraj filmoj aŭ fotografaĵoj, hejmaj artlaboroj, folkloraj dancoj kaj simile, sed konforme al la ĝeneralaj principoj de la Regularo. Efektive, okaze de la artaj festivaloj, estis aranĝitaj ankaŭ konkursoj pri aliaj artobranĉoj. En 1959 estis enkondukita ankaŭ aparta premio por „Nova Talento" (pokalo Harabagiu).

Nevalidaj por la konkurso estas verkoj jam aperintaj en presa formo. Ĉiu konkursanto konsentas per sia partopreno en la konkurso, ke la rajto pri unua presigo de premiita verko apartenas al UEA, kaj devigas sin ne publikigi ĝin aliloke, krom se UEA rifuzas la presigon. La aŭtora rajto restas, kompreneble, proprieto de la aŭtoro.

La prijuĝa Komisiono konsistas el prezidanto, sekretario kaj minimume 6 pliaj membroj, do el minimume 8 personoj apartenantaj al almenaŭ 4 nacioj. La Estraro de UEA nomas la prezidanton kaj la sekretarion, dum la ceteraj membroj estas nomataj de la Estraro laŭ la propono de la prezidanto kaj sekretario de la Komisiono. La membroj de la Komisiono ne rajtas konkursi en tiuj branĉoj, kiujn ili mem prijuĝas. Cetere, la anonimeco de la konkursantoj estas garantiita de la Regularo. La Komisiono prijuĝas la artan valoron de la konkursaĵoj ne sciante la nomojn de iliaj aŭtoroj. Nur post la decido pri la premiitaj verkoj, la Komisiono malfermas la aldonitajn kovertojn, kiuj entenas la nomojn de la aŭtoroj.

Se la juĝa tasko en iu branĉo estas tro malfacila, la prezidanto rajtas dividi la prijuĝon de la unuopaj branĉoj inter la komisionanoj; tamen, malpli ol tri membroj apartenantaj al minimume du nacioj ne rajtas decidi pri la konkursaĵoj en kiu ajn branĉo aŭ grupo de branĉoj.

Mag. Reto Rossetti, tiam docento en la Arta Kolegio en Birmingham (Britio), estis konstanta sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA ekde 1950 ĝis aprilo 1953, kiam tiun funkcion transprenis F. Szilágyi (Svedio).

La nuna prezidanto de la Komisiono estas Prof. G. Waringhien (Francio), la sekretariino estas Emilija Lapenna (Jugoslavio), kaj la membroj estas W. Auld, R. Bernard, C. Conterno, J. H. Rosbach, I. Rotkvić kaj A. Venture. Do, la Komisiono konsistas entute el 8 personoj apartenantaj al 6 nacioj. La Komisiono nuntempe prijuĝas la konkursaĵojn en du subkomisionoj: unu por poezio, la alia por prozo. La kriterioj estas sufiĉe severaj, tiel ke ne malofte la unua aŭ dua premio ne estas aljuĝita en unuopa branĉo. Okazis ankaŭ, ke en iu branĉo neniu premio estis aljuĝita.

11.2.2 Ĉefaj atingoj

La unua belarta konkurso laŭ tiu ĉi nova principaro okazis en Parizo dum la 35-a UK de Esperanto en 1950. La dua konkurso estis en Munkeno dum la UK de 1951, la tria en Oslo en 1952, la kvara en Zagreb en 1953, ktp. dum ĉiuj postaj universalaj kongresoj inkluzive tiun de Beograd en 1973. Entute, do, ĝis la fino de 1973 la belartaj konkursoj okazis 24 fojojn.

La partopreno en la konkursoj estas granda. Ekzemple, en 1952 partoprenis 43 aŭtoroj el 18 landoj per 109 konkursaĵoj. En 1953 la konkurson partoprenis 53 verkistoj el 16 landoj per 96 konkursaĵoj, el kiuj 33 estis originalaj poemoj, 23 originalaj prozaĵoj, 7 originalaj teatraĵoj kaj 33 tradukitaj poemoj. La nombro de konkursantoj kaj

la nombro de prezentitaj konkursaĵoj iom varias de jaro al jaro sed la proporcioj estas proksimume samaj, kiel en la komencaj jaroj. Ekzemple, en 1969 la nombro de aŭtoroj estis 44 el 16 landoj, kaj la nombro de konkursaĵoj estis 95; en 1970 entute 38 aŭtoroj el 19 landoj kontribuis 88 konkursaĵojn; en 1971 estis 44 aŭtoroj el 19 landoj kun 87 konkursaĵoj; en 1972 entute 43 aŭtoroj el 18 landoj prezentis 45 konkursaĵojn.

Statistiko pri premiitoj ekde 1950 ĝis inkluzive 1960 (11 jaroj) montras, ke 53 aŭtoroj el 20 landoj ricevis la unuan, duan, trian premion, aŭ premion „Nova Talento", en la diversaj branĉoj. Pli detala analizo de la rezultoj donas jenajn informojn: 27 diversaj aŭtoroj ricevis unuajn premiojn; 28 ricevis duajn premiojn, 24 ricevis triajn premiojn. El la 53 premiitoj, 27 unufoje ricevis premion; 16 estis dufoje premiitaj; 4 estis trifoje premiitaj; 2 ricevis premiojn kvar fojojn; 4 estis premiitaj pli ol kvarfoje. Ankaŭ tiu konciza statistiko montras la larĝan, internacian bazon de la Esperanta kulturo [1].

Entute, ekde 1950 estis prezentitaj preskaŭ 2.000 konkursaĵoj en diversaj branĉoj. Plej forte estis reprezentita poezio (originala kaj traduka); kompare kun la aliaj konkursaĵoj, la nombro de originalaj kaj tradukaj teatraĵoj (ludodaŭro maksimume 25 min.) estis malgranda. Laŭ la raporto de la sekretariino E. Lapenna (marto 1973) la nombro de ĉiuj premiitoj ekde 1950 ĝis inkluzive 1972 estis precize 100 el 26 landoj. Estas enkalkulitaj ankaŭ la ricevintoj de la subpremiaj distingoj „Nova Talento" kaj „Laŭda Mencio". Britaj aŭtoroj (Angloj kaj Skotoj) ricevis 19 premiojn, italaj aŭtoroj gajnis 9 premiojn; sekvas Ĉeĥoslovakio kun 7 premioj kaj Francio, Japanio, Jugoslavio, Nederlando kun Ned. Antiloj kun 6 premioj por ĉiu el la menciitaj landoj. Entute estis donitaj 288 premioj: 79 en la branĉo originala poezio, 85 por tradukita poezio, 53 por originala prozo, 26 por originala dramo, 43 por nedifinita branĉo kaj 2 por „Kongreslanda Branĉo", kiu en la lastaj jaroj ĉesis esti konkursa ero. Plej multajn premiojn (entute 21) ricevis Marjorie Boulton. Multaj el la premiitaj verkoj estis poste publikigitaj en la revuo *Esperanto* kaj en aliaj periodaĵoj.

La belartaj konkursoj de UEA kontribuis kaj plu kontribuas al evoluigo kaj riĉigo de la Esperanta Literaturo. Ili helpas al diskonigo de literaturaj verkoj, precipe de malgrandaj nacioj, al larĝa publiko. Krome, la belartaj konkursoj internacie proksimigas la poetojn kaj aliajn verkistojn. Pro ĉio ĉi ili estas faktoro de pli bona internacia kompreniĝo.

1. En *Esperanto*, 1962, oktobro, p. 181 aperis kompleta listo de ĉiuj premiitoj en la periodo 1950 ĝis 1962. Entute estis 60 diversaj premiitoj el 20 landoj.

11.3 ORATORAJ KONKURSOJ

11.3.1 Origino kaj Nuna Organizo

Esperanto unue formiĝis kiel skriba lingvo. Nur poste, iom post iom, ĝi komencis esti uzata ankaŭ parole. Tial ne estas surprize, kę ankaŭ la arta kreado per la Internacia Lingvo sekvis la saman vojon: poezio kaj literatura prozo, ĉu traduka ĉu originala, konsiderinde antaŭiris la parolarton.

La unuaj paroladoj en Esperanto estis eldiritaj de Zamenhof mem. Kvankam profundaj laŭ enhavo, ofte tre belaj laŭ strukturo kaj nepre gravegaj por la juna lingvo, tamen ili apenaŭ povas esti rigardataj kiel paroladoj en la kutima senco de la vorto. Liaj ok oficialaj kongresaj paroladoj, kaj la kelkaj aliaj, eldiritaj en diversaj okazoj, estis fakte detale antaŭpreparitaj, komplete verkitaj skribe kaj poste legitaj publike. La vera Esperanta parolarto komenciĝas nur kun la apero de E. Privat sur la kongresaj podioj kaj aliloke. En simpla kaj bela lingvo, ofte uzante trafajn bildojn kaj direktante sin ĉefe al la sentoj, li sciis per kortuŝaj vortoj emociigi kaj entuziasmigi la aŭskultantaron. Jam en tia unua periodo de la Esperanta parolarto, dum la universalaj kongresoj kaj aliloke, ĉiam pli aŭdiĝis voĉoj ankaŭ de pluraj aliaj talentaj oratoroj aŭ prelegantoj. Okazis eĉ „oratoraj konkursoj", ekzemple dum la 13-a UK en Krakovo (1931), kiam la konkurson partoprenis 8 kandidatoj.

Malgraŭ tiuj progresoj, la fakte grandaj esperantlingvaj oratoroj estis kaj restis nur kelkaj; ankaŭ la nombro de elstare bonaj, kompare kun la impona nombro de Esperantaj poetoj kaj prozistoj, estas ankoraŭ tro malalta. Ŝajnas, ke la Esperanta parolarto — kaj tre verŝajne la parolarto en kiu ajn alia lingvo — estas la plej malfacila kaj postulema el ĉiuj artobranĉoj, kiuj uzas la lingvon kiel instrumenton de esprimiĝo.

Por plibonigi tiun staton la Estraro de UEA decidis en 1949 enkonduki oratorajn konkursojn dum la universalaj kongresoj. La unua provo estis farita en Bournemouth (1949). La relative kontentiga rezulto — neniu, laŭ la opinio de la juĝantaro, meritis la unuan premion — kaŭzis, ke la Komitato aprobis la ideon de regulaj oratoraj konkursoj kaj transdonis al la Estraro la taskon organizi ilin. Laŭ la komisio de la Estraro, I. Lapenna ellaboris projekton de Regularo pri la Oratora Konkurso por la Junularo, kiun la Estraro unuanime akceptis dum la printempa kunsido en 1950. Samtempe la Estraro decidis, ke la temo por la unua regula oratora konkurso, okazonta dum la UK en Parizo (1950), estu „Mondpaco kaj Esperanto". Estas vere emfazinde, ke la Estraro elektis ĝuste tiun temon, kiu spegulas

la strebadojn de la Esperanto-Movado al internacia kompreniĝo, toleremo kaj monda paco.

Laŭ la Regularo pri la Oratora Konkurso por la Junularo, la celo de la konkurso estas evoluigi la parolarton en la Internacia Lingvo, sed la konkursoj, kompreneble, ankaŭ fortikigas la senton de internacia solidareco. La konkursoj regule okazas dum la universalaj kongresoj, sed ili povas okazi ankaŭ aliloke laŭ la decido de la Estraro.

En la oratora konkurso de UEA rajtas partopreni gejunuloj ĝis 28-jaraj, kiuj aliĝis al la koncerna UK. La partopreno en la konkurso estas senpaga, sed ĉiu kandidato devas sin skribe anonci al la LKK aŭ al la prezidanto de la Komisiono minimume unu tagon antaŭ la dato de la konkurso. Kompreneble, la oratora konkurso okazas en la Internacia Lingvo. La kandidatoj ne rajtas transpasi la fiksitan tempolimon. Ili devas paroli pri la temo libere, sen antaŭe skribita teksto, sed ili povas uzi memorigajn notojn.

La Estraro de UEA decidas pri la temo aŭ temoj de la konkurso, pri kio devas aperi anonco minimume unu monaton antaŭ la konkurso en la oficiala organo de la Asocio. La Estraro nomas la konkursan Komisionon kun internacia karaktero, konsistantan el prezidanto, 2 membroj kaj 2 anstataŭantoj. Same kiel rilate la belartajn konkursojn, la Estraro ankaŭ decidas pri la premioj.

La konkurso okazas publike, sub gvido de la prezidanto de la Komisiono kaj en la ĉeesto de la 2 membroj aŭ de iliaj anstataŭantoj. La Komisiono decidas per plimulto de voĉoj pri la unua, dua kaj tria gajnintoj tuj post la konkurso. La Komisiono juĝas la paroladojn el vidpunktoj enhava, lingva, stila kaj parolarta tekniko.

La nomoj de la gajnintoj estas solene proklamataj dum la fermaj kunsidoj de la kongresoj. Ĉiu gajninto ricevas diplomon de UEA, diversajn premiojn de UEA aŭ de neesperantaj organizaĵoj aŭ de privataj personoj.

En 1960 la tiama ĝenerala sekretario de UEA donacis arĝentan pokalon, kiun, aldone al la premio de UEA, ricevas la gajninto. La pokalo „Ivo Lapenna" estas transira, t.e. ĝi estas tenata de la gajninto ĝis la sekva konkurso, kiam ĝi pasas en posedon de la nova gajninto. La nomo de ĉiu gajninto estas engravurita. La unua engravurita nomo estas tiu de Carlo Minnaja, la gajninto de la unua premio en la konkurso dum la UK en Bruselo (1960).

11.3.2 Rezultoj

La unua oratora konkurso laŭ la nova Regularo okazis en 1950 dum la 35-a UK en Parizo. Ekde tiam la oratoraj konkursoj preskaŭ

senescepte okazadis dum la universalaj kongresoj. La lasta estis en Beograd (1973), dum la sekva okazos en Hamburgo (1974).

Ekde 1950 ĝis 1960 la Estraro de UEA ĉiam donis nur unu temon por la koncerna oratora konkurso. La temoj rilatis ĉefe al internacia kompreniĝo, monda paco, idea signifo de la Internacia Lingvo, k.s. Ekzemple, en 1951 (UK en Munkeno) la temo estis „La Idea Signifo de Esperanto"; en 1952 (Oslo) la priparolata demando estis „Kial mi Batalas por Esperanto?"; en 1954 (Haarlem) la elektita temo estis „La Rolo de la Internacia Lingvo por la Spirita Unueco de la Homaro"; en 1958 (Mainz) la konkursantoj estis invititaj paroli pri „Juna kaj Pli Aĝa Generacioj"; en 1959 (Varsovio) — la Zamenhof-Jaro — la temo estis „La Personeco de D-ro L. L. Zamenhof".

Por ebligi pli vastan partoprenon en la oratoraj konkursoj, la Estraro decidis en 1960, ke ekde tiu jaro la temoj estos pluraj. Krome, oni decidis ligi la temojn ne nur al aktualaj demandoj en la Esperanto-Movado, sed ankaŭ al pli vastaj problemoj kun internacia karaktero, kiuj interesas la nuntempan junularon. Ekzemple, jam por la oratora konkurso por 1960 (Bruselo) estis 4 temoj: „Internaciismo, Naciismo kaj Patriotismo", „Sporto — ĉu Rimedo de Internacia Amikiĝo?", „Virinaj Rajtoj", „Aspiroj de la Junularo en Mia Lando". Simile variaj temoj estis donitaj ankaŭ por ĉiuj postaj konkursoj. Plurfoje la temoj, aŭ almenaŭ unu el ili, rilatis al mondaj kampanjoj lanĉitaj de UN aŭ Unesko, en kiuj partoprenis UEA. Ekzemple, en 1967, pro la Internacia Jaro de Turismo, unu el la temoj estis „Turismo kaj Internacia Kompreniĝo", dum alia temo rilatis al „La Rolo de Esperanto en la Progresigo de Evoluantaj Landoj". En la Jaro de Homaj Rajtoj (1968), dum la UK en Madrid du temoj rekte rilatis al la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj: „Ĉiuj Homoj estas Denaske Liberaj kaj Egalaj laŭ Digno kaj Rajtoj", „Egaleco de Seksoj en la Universala Deklaracio", dum plia temo estis „La Fenomeno de Florinfanoj". Tre aktuala estis la temo „Kosma Veturado — Ĉu Valoras?", kiu allogis ĉiujn konkursantojn dum la UK en Helsinki (1969). En 1970 (Vieno), pro la ĉiam pli insistaj postuloj de la studentaro kaj mezgradaj gelernantoj rilate modernigon de la instrusistemoj, la temoj estis: „Aŭtoritatismo, Demokratio aŭ Anarkio en la Lernejoj", „Ĉu la Lernejoj Edukas la Junularon por la Estonteco?", „Kion Volas Nia Generacio?". Du el la temoj dum la UK en Londono (1971) rilatis al grava demando de kulturaj interŝanĝoj: „Ĉu jam Ekzistas Bazaj Elementoj de Tutmonda Kulturo?" kaj „Nacia Lingvo Vaste Uzata Internacie kaj Kultura Imperiismo".

La nombro de konkursantoj variis, sed bedaŭrinde ĝi neniam estis tre granda (maksimume 9). Male, la interesiĝo de la publiko ĉiam estis rimarkinda. Ne malofte ĉeestis 500-700 personoj. Ankaŭ okazis,

ke eĉ tre grandaj salonegoj montriĝis tro malgrandaj, tiel ke multaj ne povis eniri.

La gajninto de la unua premio en la unua konkurso (1950) estis A. Albault (Francio). En la dua konkurso (1951) N. Minnaja (Italio) kaj A. Albault estis tiel bonaj, ke ili ambaŭ ricevis la unuan premion. Inter la gajnintoj de la unuaj premioj tri fojojn troviĝas la nomo de N. Minnaja kaj tri fojojn tiu de lia frato Carlo Minnaja. La aliaj gajnintoj de la unua premio estis H. Tonkin (Anglio, nun Usono), J. Wells (Anglio), S. Świstak (Pollando), Aŝvini-Kumar (Hindio) du fojojn, K. Kordylewski (Pollando), F. Simonnet (Francio), Svetomir Budimir (Jugoslavio), H. M. Maitzen (Aŭstrio), H. Eichhorn (Germana DR), D. Charters (Anglio, nun Usono), Iva Åberg (Svedio). En Portland (1972) la unua premio ne estis aljuĝita, sed la dua, kiun gajnis C. Power (Usono).

La oratoraj konkursoj ebligis malkovri nombron da novaj elstaraj talentoj inter la junularo. Kiel oni vidas el la supra listo de la gajnintoj de unuaj premioj, la plimulto el ili ekokupis respondecajn funkciojn en la Esperanto-Movado. Ankaŭ aliaj konkursintoj, eĉ tiuj, kiuj ne sukcesis gajni premiojn, per sia nura partopreno sendube kontribuis al la evoluigo de la Esperanta parolarto kaj tial ankaŭ al la esperantlingva kulturo. Siavice, multaj el la ideoj esprimitaj dum la konkursoj helpis la prilumon de aktualaj problemoj ĉu en la nuntempa mondo ĝenerale, ĉu, aparte, en la Esperanto-Movado. La oratoraj konkursoj estas taŭga forumo, en kiu gejunuloj de diversaj nacioj kaj alispecaj apartenoj povas libere interŝanĝi ideojn kaj aŭdigi siajn voĉojn, kio certe progresigas internacian kompreniĝon. La oratoraj konkursoj en la nuna formo respondas al la fundamenta celo de UEA: evoluigi kaj fortikigi la sentojn de internacia solidareco.

11.4 TEATRO

11.4.1 Unua Periodo (1896-1957)

Estas preskaŭ certe, ke la unua teatra prezentado en la Internacia Lingvo okazis la 27-an de septembro 1896 en la urbo Smolensk (Ruslando). Tiun vesperon junaj amatoraj geaktoroj ludis la komedion *Unua Brandfaristo* de L. Tolstoj, tradukitan de V. Burenkov. Verŝajne ankaŭ en aliaj lokoj amatoraj grupetoj ludis diversajn teatraĵojn por kuraĝigi la lernadon kaj por vivigi la parolan lingvon. Cetere, ankaŭ nuntempe en unuopaj lokaj Esperanto-societoj funkcias amatoraj grupoj, kelkfoje sub gvido de profesiaj reĝisoroj, kiuj prezentas teatraĵojn en la koncernaj lokoj.

Ĝenevo 1925: Rolintoj en la dua surscenigo de *Ginevra* pozas kun Edmond Privat, la aŭtoro de la lirika dramo.





Bulgara Esperanto-Teatro: Profesiaj aktoroj kaj profesinivelaj spektakloj.

11 FORMOJ DE KULTURAJ APLIKOJ

Serioza prezentado de teatraj verkoj sur pli alta nivelo komenciĝis nur en 1905, kiam dum la 1-a UK de Esperanto en Bulonjo sep diversnaciaj amatoraj geaktoroj ludis la komedion de Molière *La Edziĝo Kontraŭvola.* La alia teatraĵo prezentita tiuokaze en Bulonjo estis la komedieto de E. Labiche *Mensogo pro Amo* (originala titolo *Le Misanthrope et l'Auvergnat).*

Dum multaj jaroj — fakte, kun kelkaj esceptoj, ĝis la hodiaŭa tago — preskaŭ la sola ebleco prezenti internacilingve dramojn kaj aliajn verkojn en teatroj estis kaj restis la grandaj internaciaj renkontiĝoj, unuavice la Universalaj kongresoj de Esperanto. Pro diversaj kaŭzoj, ĉefe pro neekzisto de konstantaj trupoj, ankaŭ tiajn okazojn ne estis eble ĉiam utiligi. Nur la fondo de Internacia Arta Teatro en 1957 (sub aŭspicio de UEA), kiun sekvis la Bulgara Esperanto-Teatro en 1958 kaj aliaj profesiaj grupoj, ebligis konstantecon kaj entute donis freŝan impeton al krea teatra laboro.

Inter 1905 kaj 1957 en diversaj lokoj estis prezentitaj sufiĉe multaj konataj kaj malpli konataj dramoj aŭ komedioj al internacia publiko. Ne malofte ludis profesiaj geaktoroj aŭ, pli kutime, profesiuloj kaj amatoroj miksite.

La ĉefaj prezentoj en tiu periodo estis *La Floro de l'Pasinto* de E. de Amicis, kaj *Agrabla Surprizo* de W. Frerking, ambaŭ en 1906 en Ĝenevo; *Boks kaj Koks* de M. Morton, kaj *Bardell kontraŭ Pickwick* de Ch. Dickens, ambaŭ en Cambridge en 1907; *Ŝi Kliniĝas por Venki* de O. Goldsmith en 1907 en Londono; *Ifigenio en Taŭrido* de Goethe en 1908 en Dresdeno; *Mistero de Doloro* de Gual en 1909 en Barcelono; *Kiel Plaĉas al Vi* de W. Shakespeare en 1910 en Vaŝingtono; *Kaatje* de P. Spaak en 1911 en Antverpeno; *Mazepa* de J. Słowacki, *La Urso* de A. P. Ĉeĥov kaj la opero *Halka* de S. Moniuszko, ĉiuj en 1912 en Krakovo; *Ginevra,* originale verkita de E. Privat, en 1913 en Bern; *Natan la Saĝulo* de G. E. Lessing en 1923 en Nürnberg; *Hamleto* de Shakespeare en 1928 en Antverpeno; *La Onklino de Karlo* de Brandon Thomas en 1930 en Oxford; *D-ro Knock* de Jules Romains en 1932 en Parizo; la opereto *La Blanka Ĉevaleto* de R. Benatzky en 1936 en Vieno; *Angla Lingvo sen Profesoro* de Tristan Bernard en 1950 en Parizo; *La Revizoro* de N. Gogolj en 1955 en Bolonjo; *Georgo Dandin* de Molière en 1957 en Marseille.

Necesas aldoni, ke en la jaroj antaŭ la Dua Mondmilito Radio Brno (Ĉeĥoslovakio) prezentis tutan aron da verkoj adaptitaj por teatra prezentado. La membroj de tiu grupo — Teatro kaj Radio Aktoroj (TRAKT) — konsistis nur el profesiaj artistoj, kantistoj, verkistoj kaj aktoroj de la Landa Teatro. La prezentoj, kiel entute la elsendoj de Radio Brno, estis sur tre alta nivelo. La dismembrigo de Ĉeĥoslovakio kaj la posta invado de tiu lando fare de nazia Ger-

manio ĉesigis ankaŭ tiun gravan atingon en la sfero de perradia teatro.

11.4.2 Dua Periodo (ekde 1957)

Tiun ĉi periodon markas la fondo de du gravaj teatraj trupoj, konsistantaj unuavice el profesiaj geaktoroj: Internacia Arta Teatro (IAT) kaj Bulgara Esperanto-Teatro (BET).

Fondita en 1957, *Internacia Arta Teatro* estas unika klopodo starigi laŭgrade, en internacia kadro, sendependan, normalan, artan teatron, konsistantan el profesiaj kaj talentaj diversnaciaj geaktoroj kaj teatraj teknikistoj. La celoj estas prezenti internacilingve teatrajn spektaklojn dum internaciaj kaj landaj Esperanto-kongresoj aŭ aliaj renkontiĝoj, partopreni en internaciaj artaj festivaloj; organizi teatrajn somerajn kursojn, teatrajn turneojn kaj interŝanĝojn inter diversnaciaj profesiaj Esperantaj teatraj grupoj. La fondon de IAT aŭspiciis Universala Esperanto-Asocio, kiu donis al la laboro de IAT maksimuman apogon. La fondinto kaj direktoro estas Srdjan Flego.

La unua prezento de IAT okazis en Mainz (1958), kiam ĝi ludis la konatan dramon *Reaperantoj (Fantomoj)* de H. Ibsen. *Friponaĵoj de Skapeno* de Molière estis prezentita en Varsovio en 1959. En la sama jaro la ĵus fondita Bulgara Esperanta Teatro prezentis en Varsovio la komedion *Ĉasantoj de Oficoj* de la bulgara klasikulo Ivan Vazov, dum trupo el Prago ludis samloke *Pigmaliono* de B. Shaw. Tio estis vera evento: en la sama loko tri trupoj prezentis unuarangajn teatrajn verkojn en la Internacia Lingvo.


El aliaj realigoj de IAT aparte menciindaj estas *La Homa Voĉo* de J. Cocteau kaj *La Respektema P...* de J. P. Sartre en 1961, unue en Gent (Belgio) kaj poste en Harrogate (Anglio); *Advokato Patleno* de nekonata aŭtoro same en Harrogate en 1961; *Onklo Maroje*, la klasika kroata komedio de Marin Držić, kaj la originala *Maneken-parado* de M. Boulton, ambaŭ en Kopenhago en 1962; *Pri la Malutilo de la Tabako* de A. P. Ĉeĥov; *Sen Eliro* de J. P. Sartre kaj *Hanibalo* de la jugoslavia verkisto V. Kljaković, ĉiuj en Sofio en 1963; *La Amo de Don Perlimplino* de F. Garcia-Lorca, *La Leciono* de E. Ionesco, *La Morto de Lia Ekscelenco* de M. Matković, ĉiuj en Hago en 1964; *La Unua Paŝo* de la hungara verkisto F. Molnár, kaj *La Holanda Pupo*, originale verkita de J. Baghy, ambaŭ en Budapeŝto en 1966; *Bela Indiferentulo* de J. Cocteau, *Analfabeto* de la serba verkisto B. Nušić, tre populara en Jugoslavio, *Taso da Kafo*, monologo de la granda slovena verkisto Ivan Cankar, *Homo kun la Floro Enbuŝe* de L. Pirandello kaj *Maskerado* de la konata kroata verk-



Kataki de la usona verkisto Shimon Wincelberg, prezentita de polaj aktoroj el Łódź, gajnis aplaŭdojn en la Universalaj Kongresoj de Tokio kaj Budapeŝto.



Srdjan Flego (supre): La plej atentindaj rezultoj sur la teatra kampo. Malsupre: Nikolaj Rytjkov (1913-1973) komplete disponigis sian teatran talenton al la Internacia Lingvo.



isto M. Krleža, ĉiuj en 1968 en Madrid; *Vilhelmo la Konkeranto* de la jugoslavia verkisto V. Kljaković, *Aparta ĉambro* de la franca verkisto Claude Santelli, *Hotelo de Pepo Bandić*, unuakta sceno de alia jugoslavia verkisto, Branko Čopić, *Sonoriloj* de plia jugoslavia aŭtoro, S. Rozman, ĉiuj en 1969 en Helsinki. Pluraj el la menciitaj teatraĵoj estis prezentitaj du aŭ eĉ tri fojojn. IAT evoluigis en nur kelkaj jaroj la teatran arton en la Internacia Lingvo kaj atingis rimarkindajn rezultojn, des pli grandajn, se oni konsideras la malfacilaĵojn kaj obstaklojn, kiujn necese frontas tia trupo kun internacia karaktero. Bedaŭrinde, post 1969 IAT ne aperis sur teatra podio antaŭ internacia publiko, sed espereble ĝi renovigos sian utilan kaj fruktodonan laboron.

En IAT ludis tre multaj geaktoroj. Ĉiu el ili havas siajn meritojn por evoluigo de la trupo, sed veršajne, aldone al S. Flego, pleje elstaras la nomoj de M. Šerment, Eta Bertolazzi, Mira Župan, Jana Ravšelj, Liljana Genez, D. Milivojević, I. Rogulja, Silva Fulgosi, Zdenka Heršak, M. Ergović, Božena Dermit, Marija Dragović kaj Jure Lipovac.

Bulgara Esperanto-Teatro (BET) estis fondita en 1958. La kerno de BET estas malgranda rondo de entuziasmaj artistoj, parolantaj la Internacian Lingvon, en la antaŭa teatro „Trudov Front" en Sofio. Inter ili troviĝas Anani Anev, Belka Beleva, Gerasim Mladenov, Kostadinka Nedeva, Georgij Kerelezov, k.a. La grupon daŭre subtenis reĝisorino Stefka Prohaskova, dum la tradukanto kaj lingva gvidanto estas Kiril Draĵev.

La unua spektaklo, konsistanta el 13 unuaktaj komedioj, poemoj kaj monologoj, okazis la 19-an de majo 1958. La sama programo estis prezentita en la sama jaro dum la 33-a Kongreso de BEA en Varna. Kiel jam menciite, en 1959 BET prezentis la komedion *Ĉasantoj de Oficoj* en Varsovio. Tiun komedion BET ludis poste en la Tria Kultura Festivalo de Jugoslaviaj Esperantistoj en Split. Sekvis la prezentoj de *Komedio de Eraroj* de Shakespeare unue en Veliko Târnovo kaj poste ankaŭ en Sofio dum la 48-a UK de Esperanto (1963). En 1964 du geaktoroj de BET — Belka Beleva kaj Anani Anev — estis invititaj partopreni la aranĝojn de IAT en Hago kaj en Amsterdam. Tie ili prezentis *Propono* de A. P. Ĉeĥov kaj atingis grandan sukceson. BET denove ludis antaŭ internacia publiko dum la UK en Budapeŝto (1966), kie ĝi prezentis la dramigitan *Tago de Mortintoj* laŭ Elin Pelin kaj la komediojn *La Urso* de A. P. Ĉeĥov, *La Du Ŝtelistoj* de B. Nušić kaj *Familiaj Problemoj* de May Thalvest.

Komence de 1968 BET renovigis sian konsiston. Unu el ĝiaj lastatempaj atingoj estis la komedio *Akridoj* de St. L. Kostov, kiun ĝi prezentis dum la 20-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-

Federacio kaj la 37-a Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj en Varna. En 1970 BET prezentis en Vieno la komedion *La Virina Regno* de la bulgara aŭtoro St. L. Kostov. En 1971, dum la UK en Londono, tiu eminenta teatra trupo, nun konsistanta ĉefe el profesiaj geaktoroj de la Ŝtata Teatro en Sofio, rikoltis entuziasman akcepton per sia prezento de la kvinakta komedio *Mandragoro* de N. Machiavelli. BET plu aktivas kaj oni atendas de ĝi pliajn spektaklojn sur la plej alta arta nivelo.

El aliaj grupoj aparte menciinda estas la Silezia Teatro, kiu en 1968 partoprenis en la Festivalo de Esperanto-teatroj en Pula (Jugoslavio). Ĝi tie prezentis la unuan fojon *Manon Lescaut*, teatraĵon en ses bildoj laŭ la romano de Abbé Prévost. En 1964 profesiaj polaj aktoroj prezentis en Łódź, Pollando, la dramon *Kataki* de la usona verkisto Shimon Wincelberg. Kun grandega sukceso ili ludis la saman dramon ankaŭ en Tokio en 1965 kaj en Budapeŝto en 1966.

11.5 INTERNACIAJ ARTAJ FESTIVALOJ

Impona kultura evento kaj samtempe manifestacio pri la atingoj de la Internacia Lingvo sur la arta kampo estas la Internaciaj Artaj Festvaloj (IAF), pionira iniciato de D-ro I. Lapenna, kiu ankaŭ estis la ĉefa organizinto de la Unua IAF kaj kompilinto de ĝia programo.

Ĝis la fino de 1972 estis aranĝitaj entute kvar IAF en diversaj lokoj: Harrogate (1961), Sofio (1963), Budapeŝto (1966) kaj Madrid (1968).

11.5.1 Unua Internacia Arta Festivalo

Ĝi okazis en Harrogate (Britio) de la 6-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1961. La programo konsistis el teatraj prezentadoj, kantoj, dancoj, belartaj kaj oratoraj konkursoj, deklamado de poezio, ekspozicioj, filmoj kaj prelegoj en Internacia Somera Universitato pri artaj temoj.

La festivalo komenciĝis la 6-an de aŭgusto, kiam la ensemblo „Branko Cvetkoviĉ" el Beograd prezentis jugoslaviajn *folklorajn dancojn*. La programo konsistis el 16 dancoj el diversaj partoj de Jugoslavio, interalie el la regionoj de Banat, Niŝ, Bunjevci, Homolje, Rugovo kaj Vranje, el Makedonio, Slovenio kaj Dalmatio, akompanataj de kantado, popolaj instrumentoj aŭ tamburado. La movoj, jen graciaj, jen batalemaj kaj fulmorapidaj, seninterrompe katenis la streĉan atenton de la publiko.

11.5 INTERNACIAJ ARTAJ FESTIVALOJ

La ĉefa evento de la festivalo estis la *teatraj prezentadoj*. Partoprenis Internacia Arta Teatro (IAT) kaj du amatoraj trupoj: unu el Londono, la alia el Bristolo (Anglio). Tiu branĉo de la festivalo komenciĝis per *Advokato Patleno*, triakta teatraĵo de nekonata mezepoka franca aŭtoro. Ludis IAT sub reĝisorado de S. Flego. Sekvis *Okuni kaj Gohei*, unuakta dramo de Tanizaki juniĉiro, el la Tokugawa-epoko (1603-1868), prezentita de amatora trupo el Londono kaj *La Urso*, unuakta komedio de A. Ĉeĥov, prezentita de amatora grupo el Bristolo kun la helpo de la konata profesia aktoro Mladen Šerment. Du pliaj teatraĵoj — *La Homa Voĉo* de Jean Cocteau kaj *La Respektema P...* de J. P. Sartre, ambaŭ en brila traduko de Roger Bernard, estis prezentitaj de IAT.

Sub la titolo *Arto kaj Vivo* okazis tre interesa programo, en kiu partoprenis 29 amatoroj el 9 nacioj kaj granda ĥoro. La ĉefa ero de tiu aranĝo estis dediĉita al la komponisto F. Liszt memore al la 150-jara datreveno de lia naskiĝo: granda internacia rolantaro prezentis scenojn el lia vivo kun muzika akompano. Tiun tutan parton de la programo prizorgis la pianisto Roland Dupuis el Svedio.

Mediteraneo Kantas konsistis el vera bukedo de hispanaj, francaj, italaj, israelaj kaj libanaj kantoj, kiujn prezentis Junulara Kantĥoro el Ljubljana (Jugoslavio), sub la gvido de ĥorestro Vili Ŝuka.

En la kadro de la festivalo estis montritaj pluraj *filmoj* kun sonkomentoj en Esperanto. En la programo *Ĥoreto de Poezio* estis deklamitaj elĉerpaĵoj de „Paolo kaj Francesca" el la *Infero* de Dante kaj partoj el la fama originalo verko *La Infana Raso* de W. Auld. Krome la poetoj J. Baghy, Marjorie Boulton, V. Sadler kaj W. Auld deklamis po unu el siaj originalaj poemoj. Unu el la temoj de la *Oratora Konkurso* estis „En kiu Senco Arto estas Internacia?". La gajnintoj de la dua kaj tria premioj — Eliza Weide (Germanio) kaj G. Turone (Italio) — faris siajn konkursajn paroladojn pri tiu temo. La regulaj, ĉiujaraj *belartaj konkursoj* troviĝis en la kadro de la festivalo.

Nombro da prelegoj en *Internacia Somera Universitato* rilatis al artaj temoj. Prof. G. Waringhien prelegis pri la temo „Kien la Arto?"; Prof. I. Lapenna prelegis pri „La Parolarto en la Internacia Lingvo"; Mag. W. Auld parolis pri „La Evoluo de la Esperanta Poezio"; Lic. T. Sekelj pritraktis la temon „Artoj en Afriko"; Prof. Yagi hideo prelegis pri „Esenco de Japana Arto".

La *aliaj festivalaj aranĝoj* konsistis el konkurso pri la plej bona afiŝo rilatanta al Esperanto (preskaŭ 100 projektoj alvenis); fotokonkurso „La Homaro"; ekspozicioj de la itala pentristo Eupremio Lo Martire, fotoj pri la vivo kaj popolo de Japanio, kaj kolekto de

klasikaj japanaj lignogravuraĵoj; fine, lumbilda prelego kun fortepiana akompano pri Beethoven. Ankaŭ tiun programon prezentis R. Dupuis.

11.5.2 Dua Internacia Arta Festivalo

La festivalo komenciĝis la 4-an de aŭgusto per la *Bulgara Arta Vespero* kaj finiĝis la 9-an de aŭgusto (1963) per la *Internacia Distra Vespero*. En la programo partoprenis Internacia Arta Teatro kaj Bulgara Esperanto-Teatro, artistoj de diversaj landoj, kanthoroj kaj pluraj amatoraj trupoj.

Ankaŭ dum tiu ĉi festivalo la ĉefa evento estis la *teatraj prezentadoj*. El teatra vidpunkto la Dua Festivalo nete superis la Unuan per la nombro de prezentitaj verkoj. Pri la arta nivelo la komparo estas malpli facila: ne ĉiujn mankojn oni sukcesis venki, kvankam la granda plimulto de la prezentoj impresis harmonie kaj mature.

Jen, plej koncize, la ĉefaj programoj de la festivalo.

Entute estis prezentitaj sep teatraĵoj: *Pri la Malutilo de la Tabako*, monologa unuakta sceno de A. P. Ĉeĥov, prezentita de S. Flego; *La Homa Voĉo* de J. Cocteau, prezentita de IAT; *La Respektema P...* de J. P. Sartre, prezentita de IAT; *Komedio de Eraroj* de W. Shakespeare, prezentita de Bulgara Esperanto-Teatro; *Hanibalo* de V. Kljaković, prezentita de IAT; *Sen Eliro* de J. P. Sartre, prezentita de IAT; *Vilhelmo la Konkeranto* de V. Kljaković, ankaŭ ĝi en la prezento de IAT.

Bulgara Arta Vespero konsistis el du partoj; la koncerta kaj la folklora. En la unua parto konataj bulgaraj operkantistoj kaj aliaj artistoj, ĉiu el ili laŭreato de tiu aŭ alia internacia konkurso. Kantis Blagovesta Karnobatlova (soprano), Todor Bonev (tenoro), Sonja Hamernik (mezosoprano), Katja Popova (lirika soprano) kaj Stefan Cigančev (baso). Partoprenis la konata violonisto Emil Kamilarov, Margarita Trajanova (solodancistino) kaj Nenĉo Smilov (dancisto), ambaŭ membroj de la Nacia Opera Teatro. La dua parto konsistis el folkloraj dancoj kaj kantoj. En la fino la ensemblo „Majakovskij" prezentis plurajn popolajn dancojn el diversaj regionoj de Bulgario.

Ankaŭ la *Internacia Arta Vespero* konsistis el du partoj. En la unua partoprenis la kanthoro „Luigi Gazotti" el Modena (Italio), kiu kantis klasikajn komponaĵojn kaj operajn ariojn; Deguĉi kjotaro kaj Umeda jošimi (Japanio) prezentis japanajn melodiojn en „noo-stilo"; Stanislava Dabek (Pollando), opera kantistino, kantis plurajn klasikajn ariojn kaj folklorajn melodiojn; Nikolaj Rytjkov, aktoro el Moskvo (poste Londono), deklamis kelkajn tekstojn;

R. Jordanova, opera kantistino el Bulgario, kantis ariojn el klasikaj operoj; La Studenta Okteto el Ljubljana (Jugoslavio) prezentis programon „Kantoj de Popoloj el ambaŭ Duonsferoj". En la dua parto de la programo partoprenis la membroj de Internacia Arta Teatro, junulara kanthoro el Pollando, dancensemblo „Ivo Lola Ribar" el Jugoslavio kaj pluraj unuopaj artistoj. Dum la programo estis aŭdigitaj ankaŭ melodioj el Madagaskaro.

En la kadro de la festivalo okazis *oratora konkurso*, kiun partoprenis 9 gejunuloj el 9 malsamaj landoj. La unuan premion gajnis S. Świstak (Pollando), kiu parolis pri la temo „Kiel Reciproka Aprezado de Kulturaj Valoroj Povas Kontribui al Kompreniĝo Inter la Popoloj?" La duan premion gajnis Deguĉi kjotaro (Japanio) pro sia parolado pri „Kia Estu la Enhavo de Kultura Agado de la Junularo?" Ankaŭ la *belartaj konkursoj* estis parto de la festivalo. La *aliaj eventoj* estis deklama konkurso (deko da diversnaciaj deklamantoj), fotokonkurso (82 fotoj de 19 konkursantoj), ekspozicioj de fotografaĵoj, grafikaĵoj kaj pentraĵoj. En *Internacia Somera Universitato* pluraj temoj rilatis al literaturo kaj artoj ĝenerale. D-ro V. Sadler parolis pri „Ĉu Kulturoj aŭ Kulturo?"; Prof. P. Dinekov prelegis pri „Evoluo de la Bulgara Literaturo"; Prof. D-ro Stojan Ĝuĝev pritraktis la temon „La Muziko de la Lingvo"; Mag. Marjorie Boulton prelegis pri „Metaforoj, Klišoj kaj Slango".

11.5.3 Tria Internacia Arta Festivalo

Ĝi okazis en Budapeŝto de la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1966. En la programo partoprenis tri teatraj trupoj, artistoj de diversaj landoj, dancgrupo kaj kantistoj.

La nombro de *teatraj spektakloj* estis pli granda ol en la du antaŭaj festivaloj. Ankaŭ la arta kvalito de la prezentoj superis la antaŭajn. Internacia Arta Teatro prezentis tri teatraĵojn: *La Unua Paŝo* de F. Molnár, tradukita el la hungara de K. Bodó; *La Morto de Lia Ekscelenco* de M. Matković, tradukita el la kroata de S. Flego; *La Holanda Pupo*, verkita originale en Esperanto de J. Baghy. La Bulgara Esperanto-Teatro ludis kvar unuaktajn komediojn: *Familia Miskompreno* de May Thalvest; *Dio Absolvu* de Elin Pelin; *La Urso* de A. P. Ĉeĥov; *Du Ŝtelistoj* de B. Nušić. La Pola Ŝtata Teatro Populara el Łódź ludis *Kataki-Malamiko* de Shimon Wincelberg en la traduko de T. Markowsky kaj J. Uśpieński. Karina Waśkiewicz, aktorino de la Ŝtata Dramteatro en Bjalistoko, prezentis la tragedion *La Morto sur la Marbordo de Artemido* de Roman Brandstaetter en la traduko de Lech Piotrowski (tiu ĉi dramo prezentas novan, originalan version de la mito pri Ifigenia); Jadwiga Gibczyńska, aktorino el Pollando, deklamis la monologojn *Eta Princo* de

A. de Saint-Exupéry en la traduko de P. Delaire, kaj *Vojaĝo al Verdaj Ombroj* de Finn Methling. Internacia Arta Teatro prezentis ankaŭ nombron da unuaktaĵoj kaj monologoj dum unu vespero.

Hungara Folklora Vespero konsistis el hungaraj muziko kaj dancoj el diversaj regionoj de Hungario. En la programo partoprenis Junulara Popoldanca Ensemblo kaj ĥoro, ciganorkestro kaj pluraj gekantistoj. *Literatura Matineo* sukcese prezentis iom el la spirito, etoso kaj nivelo de la hungara literaturo. Eminentaj junaj artistoj deklamis poemojn, legis partojn de noveloj, prezentis popolkantojn, muzikigitajn poemojn kaj dramajn scenojn. *Hungara Ŝtata Pupteatro* partoprenis en la festivalo per *Sorĉa Fajrilo* de H. C. Andersen, en la traduko de L. Somlai. *Ĉu Esti aŭ Ne Esti?*, unuakta dramo de Marjorie Boulton, originale verkita en la Internacia Lingvo, havis apartan prezenton en la Kulturdomo de Budapeŝto. *Angoroj*, la unua fikcia filmo plene en la Internacia Lingvo, havis plurajn prezentojn dum la tuta semajno de la festivalo. Alia filmo — *Oomoto-Festivalo*, ankaŭ en Esperanto — estis same tiel plurfoje prezentita. *Koncerto de modernaj kantoj kaj bulgaraj naciaj kantoj* estis donita de Veselin Damjanov kaj Valentina Despotova, du bulgaraj geartistoj. Dum *Japana Aranĝo* kelkaj membroj de la japana delegacio prezentis interesajn aspektojn de japana hejma arto, precipe pri ĉanojo (te-ceremonio), ikebano (floraranĝo), sorobano (kalkulilo), paperfalda arto kaj belskribado. F. Chopin *Animo de L'Piano*, prelego de R. Dupuis ilustrita per diapozitivoj kaj muzikaj ekstraktoj, kompletigis tiun ĉi parton de la ampleksa programo.

Ankaŭ ĉi-foje la *Oratora* kaj *Belartaj Konkursoj* troviĝis en la kadro de la festivalo. En *Internacia Somera Universitato* denove kelkaj prelegoj rilatis al literaturo kaj artoj. Prof. J. Vrančić prelegis pri la temo „Sur la Fonto de la Moderna Pentroarto"; Prof. S. Ĝuĝev parolis pri „Sur la Spuroj de Orfeo"; Prof. Imre Ungár parolis pri „Béla Bartók kaj la Hungara Popolmuziko"; Prof. G. Waringhien pritraktis la temon „La Budapeŝta Literatura Skolo"; Prof. I. Lapenna prelegis pri „Protekto de Aŭtoraj Rajtoj kun Aparta Konsidero al la Universala Konvencio de Unesko".

11.5.4 Kvara Internacia Arta Festivalo

La festivalo daŭris de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1968. En Madrid plian fojon kolektiĝis geartistoj de diversaj landoj por prezenti interesan programon, kvankam iom malpli ampleksan ol dum la budapeŝta festivalo.

En la *teatraj prezentadoj* ĉi-foje povis partopreni nur Internacia Arta Teatro. Ĝi prezentis sep teatraĵojn: *Malfacila Elekto*, antaŭ-

kurtena ŝerco; *Bela Indiferentulo,* unuakta tragikomedio de Jean Cocteau, tradukita el la franca de R. Bernard; *Suspektinda Persono,* duakta komedio de B. Nušić, tradukita el la serba de A. Sekelj; *Taso da Kafo,* monologo de Ivan Cankar; *Homo kun la Floro Enbuŝe,* unuakta dramo de L. Pirandello, tradukita el la itala de S. Flego; *Maskerado,* unuakta karnavala amludo de M. Krleža, tradukita el la kroata de S. Flego; *Manekenparado,* originale verkita en Esperanto de Marjorie Boulton.

Koncerto de popolaj kantoj estis prezentita de la fama Coral Zaragoza, kiu brile kantis sub la direkto de José Borobia. La programo konsistis el 15 kantoj. *Varia arta vespero* estis dividita en du partoj. En la muzika parto estis prezentitaj verkoj de Ĉajkovskij, Beethoven, Sinding, Chopin, Sibelius, Mascagni, Liszt, Granados, Debussy, kiel ankaŭ finnaj popolkantoj en Esperanto-traduko. La poezia parto konsistis el poemoj de Maksim Gorkij kaj Aleksandr Solĵenicin. Partoprenis la pianisto Roland Dupuis, la rusa aktoro Nikolaj Rytjkov, la nederlanda kantistino Ramona van Dalsem kaj la finna Sirkka Lehtivaara. *Festa Tago en Parizo* estis la titolo de prelego-koncerto prezentita de R. Dupuis.

En la kadro de la festivalo okazis la *oratora* kaj *belartaj konkursoj.* En *Internacia Somera Universitato* D-ro H. Tonkin prelegis pri „La Angla Renesanco kaj Ĝia Poezio", dum Prof. G. Waringhien parolis pri „Hispanujo en la Spegulo de la Franca Teatro".

11.6 FILMO

Kelkaj grandaj filmfakuloj, ekzemple Laemmle kaj Chaplin, rekonis la valoron de Esperanto por la parolfilmo, precipe pro la granda klareco de la lingvo. Tamen, ĝis nun okazis nur kelkaj provoj. Kinematografio certe ne estas la plej vaste plugita kampo de aplikado de la Internacia Lingvo por specifaj kulturaj celoj.

En 1929 la filmkompanio „Paramount" produktis tute mallongan Esperantan filmon, kiu estis prezentita dum la Esperanto-kongreso de Norda Ameriko. En 1930 la sama kompanio produktis alian filmeton okaze de la UK de Esperanto en Oxford. En 1933, en ligo kun la Skolta Mondtendaro en Gödöllö (Hungario), estis produktita granda ĵamborea sonfilmo, en kiu troviĝis ankaŭ sceneto en Esperanto.

La unua plena sonfilmo en Esperanto estis *Morgaŭ ni Komencos la Vivon.* Ĝi estis produktita originale en la germana lingvo kaj poste oni aldonis esperantlingvan parolon, sub la direktado de la konata verkisto kaj reĝisoro Jean Forge. La filmo estis unue pre-

zentita en 1934 dum la UK de Esperanto en Stockholm kaj rikoltis tre bonan akcepton.

Estas menciinde, ke en la mondfama filmo de Chaplin *La Granda Diktatoro* ĉiuj surskriboj de la butikoj en la juda kvartalo estas en Esperanto. Alia iom grava usona filmo, kiu uzis la Internacian Lingvon, estas *Idiot's Delight* (Ĝuo de Idioto).

Post la dua Mondmilito, laŭ komisio de Brita Esperantista Asocio, komerca filmentrepreno produktis filmon, en kiu oni prezentas la lingvajn malfacilaĵojn kaj la solvon, kiun donas Esperanto. En 1951 la jugoslavia filmentrepreno „Triglav" produktis kulturan filmon *Ni Obeigos la Akvojn* kun klarigoj en Esperanto. Tiu filmo estis prezentita ankaŭ en eksterlando kaj elvokis konsiderindan atenton. En 1953 Aŭstralia Novaĵa kaj Informa Servo pretigis sonfilmon *Aŭstralio Hodiaŭ* kun teksto en Esperanto. Tiu filmo estis dum pluraj jaroj vaste prezentata en diversaj landoj. En 1954 aperis la filmo *Danlando,* produktita de la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj. En 1955 estis produktita en Beograd mallonga filmo por „Filmske Novosti" (Filmaj Novaĵoj), kiu estis prezentita poste en la jugoslaviaj kinejoj. Kultura filmo pri *Novzelando* estis produktita en 1957. En 1958 Vojaĝtrafika Asocio por Oslo kaj Ĉirkaŭaĵo produktis 15-minutan koloran filmon *Bonvenon al Oslo.* En 1959 aperis sur la kinomerkato la granda japana filmo *La Sturmo de Johano Arima,* farita de Itoo daisuke, unu el la plej konataj reĝisoroj. En la filmo pluraj dialogoj estas parolataj en Esperanto. En 1972 estis produktita plia filmo pri *Aŭstralio,* jam la kvara laŭvice, en kiu estas prezentitaj la ekonomia evoluo kaj eblecoj de tiu lando en la 70-aj jaroj.

La unua fikcia filmo plene en la Internacia Lingvo estis *Angoroj,* produktita de J. L. Mahé en Parizo. Temas pri kriminala filmo, en kiu la ĉefajn rolojn ludas geaktoroj S. Flego, Marc Darnault kaj Jana Flego-Ravšelj. La filmo estis prezentita en diversaj lokoj, plej multe dum la Tria Internacia Arta Festivalo en Budapeŝto (1966).


En 1966 la konata „Paramount" produktis la filmon *Incubus,* en kiu la dialogoj estas en Esperanto. Bedaŭrinde la geaktoroj tute ne regas la lingvon, tiel ke la filmo ne povas esti rigardata kiel sukcesa el tiu vidpunkto.

En la lastaj jaroj estis produktitaj ankaŭ pluraj aliaj kulturaj filmoj. Menciindaj estas la unuhora *Brila Festotago,* produktita en 1965 okaze de la 15-a datreveno de Ĉina Popola Respubliko; *Esperanto-Fonto,* produktita de „Hungarofilm" en Budapeŝto (1966); *Gotenburgo,* kolora filmo pri tiu sveda urbo; *Oomoto-Festivalo,* duonhora filmo pri internacia festivalo en Kameoka (Japanio)) en 1965, produktita de Oomoto; *Spuroj de la Historio,* en kiu estas pre-



Sur la filma kampo oni ankoraŭ restis ĉe pli aŭ malpli sukcesaj provoj: Jana Flego-Ravšelj en la filmo *Angoroj*, kiun produktis J.L.Mahé.

La Pupteatro el Ruse (Bulgario): Ekde 1968, en Zagreb kaj kelkaj apudaj jugoslaviaj urboj, ĉiujare okazas Pupteatraj Internaciaj Festivaloj, kies sola laborlingvo estas Esperanto; PIF jam altiris dekojn da pupteatroj el pluraj landoj kaj multajn dekmilojn da spektantoj.



zentita la urbo Mainz (F.R.Germanio); *48-a Universala Kongreso de Esperanto,* dokumenta filmo produktita en 1963; *Mi estis Tie,* kolora turisma filmo pri vojaĝo en Suda Norvegio, produktita de Norvega Ŝtata Fervojo en 1970; *Varsovio Matene* kaj dokumenta filmo *Vidindaĵoj de Wroclaw.*

Mondfamaj kompanioj produktis reklamajn filmojn, el kiuj kelkaj sendube havas ankaŭ edukan valoron. Al tiuj apartenas *Eŭropa Rapsodio,* duonhora, produktita de Philips; *Ĝermoj de Lumo,* iom pli ol duonhora, produktita de Gevaert (nun Agfa-Gevaert); pluraj filmoj de Fiat, inter kiuj la 40-minuta *Fiat-Aŭtomobiloj, Fiat 850, Renkonto kun Fiat.*

11.7 PUPTEATROJ

Kiel menciite, en la Tria Internacia Arta Festivalo en Budapeŝto (1966) partoprenis ankaŭ Hungara Ŝtata Pupteatro, kiu atingis ĝeneralan aplaŭdon per sia elstara prezento de *Sorĉa Fajrilo* laŭ H.C. Andersen (v. supre 11.5.3). Ĝi montris la grandajn eblecojn pri plua, multe pli vasta utiligo de la Internacia Lingvo kiel rimedo de komunikado ankaŭ en tiu aparta sfero de sceneja arto.

La ideo trovis fekundan grundon en Zagreb, kie Studenta Esperanto-Klubo sub la gvido de Zlatko Tiŝljar iniciatis okazigon de internaciaj festivaloj de profesiaj pupteatroj, en la komenco ankaŭ de duonprofesiaj. En tiu agado la iniciatintoj renkontis ne nur komprenemon, sed ankaŭ apogon kaj financan subtenon de la edukaj kaj ĝenerale kulturaj instancoj en Jugoslavio kaj en aliaj landoj, kies trupoj partoprenis. Ekde 1968 ĝis la fino de 1972 entute okazis kvin Pupteatraj Internaciaj Festivaloj (PIF), ĉiuj en Jugoslavio.

La Unua PIF okazis en Zagreb de la 6-a ĝis la 8-a de julio 1968. Partoprenis kvin pupensembloj: Hungara Ŝtata Pupteatro kaj Pupteatro de Regöci-Szabo el Budapeŝto, Rumana Ŝtata Pupteatro de Cluj, Centra Pupteatro de Sofio kaj Zagreba Pupteatro. Ili prezentis en la Internacia Lingvo ses scenludojn por infanoj. La evento elvokis grandan interesiĝon de la gazetaro, radio kaj televido. Unu el la plej popularaj jugoslaviaj semajnaj gazetoj, *Arena,* publikigis longan raporton, en kiu, interalie, estis dirite: „Ses scenfabelojn skribitajn en kvar naciaj lingvoj Esperanto tiamaniere kunligis je unika festivala teatra travivaĵo kaj — kio estas multe pli grava — je komuna espero, ke la malgranda publiko de ĉiuj landoj de la mondo iam, kvankam eble nur en fora estonteco, ne bezonos tradukistojn kaj klarigantojn por kompreni la parolon de pupoj kaj pupistoj de ĉiuj naciecoj".

11.7 PUPTEATROJ

La jugoslavia televido raportis kvin fojojn kaj la radio disaŭdigis dek elsendojn, el kiuj tri estis pli ol kvaronhoraj. La festivalon rigardis ĉ. 700 personoj, sed pere de la televidaj elsendoj verŝajne pluraj dekmiloj. La pupteatro el Cluj faris du kromajn prezentadojn: en Beograd kun 100 spektantoj kaj en Medulin, internacia kolonio de infanoj, kie 800 infanoj rigardis la spektaklon.

Tiu ĉi festivalo, same kiel la postaj, okazis sub la patroneco de Unuiĝo Internacia de Marionetistoj (UNIMA).

En la *Dua PIF*, okazinta de la 3-a ĝis la 9-a de oktobro 1969 en Zagreb, partoprenis ses profesiaj pupteatroj el kvin landoj: Rumanio (2), Ĉeĥoslovakio, Pollando, Hungario kaj Jugoslavio. Entute estis prezentitaj ses scenludoj 11 fojojn antaŭ 3.000 spektantoj.

La *Tria PIF* okazis en Zagreb kaj en la apuda urbo Sisak de la 5-a ĝis la 11-a de oktobro 1970. Partoprenis sep pupteatroj el sep landoj per sep scenludoj. Entute estis 26 prezentoj antaŭ ĉ. 8.000 spektantoj.

La *Kvara PIF* okazis en Zagreb, Sisak kaj Varaždin de la 2-a ĝis la 9-a de oktobro 1971. Sep pupteatroj el ses landoj donis 42 prezentojn antaŭ 15.000 spektantoj.

La *Kvina PIF* okazis plian fojon en Zagreb kaj Sisak. Ĝi daŭris de la 30-a de septembro ĝis la 7-a de oktobro 1972. En la festivalo partoprenis 11 pupteatroj el ok landoj: Soveta Unio, Hindio, Britio, Rumanio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Bulgario kaj Jugoslavio. Entute estis 62 prezentoj, kiujn rigardis ĉ. 17.000 spektantoj.

El la supraj koncizaj informoj klare vidiĝas la granda progreso de la pupteatraj festivaloj kaj el vidpunkto de la partoprenantaj ensembloj kaj el tiu de la nombro de spektantoj. Ĝi estas unika siaspeca evento en la mondo de kulturo.

En la kadro de la festivaloj okazis simpozioj, dum kiuj la partoprenantoj diskutis pri aktualaj problemoj de la pupteatra arto. Ekzemple, dum la Kvara PIF estis pridiskutita la demando pri la krea apliko de modernaj teknikaj rimedoj en pupprezentaĵoj. Montriĝis, ke la ĉiam pli fantazia, sed en multaj kazoj ankaŭ ĉiam pli altruda uzo de tiaj rimedoj alproksimigas la puparton al iuj aliaj nuntempaj medioj (filmo, radiofonio kaj eĉ televido), sed samtempe malproksimigas ĝin de ĝi mem kaj de ĝia krea naturo.

La sukceso de la festivaloj kuraĝigis la organizadon de turneoj de unuopaj teatraj trupoj en aliaj landoj. Ekzemple, la Zagreba Pupteatro gastis en majo 1970 en Danlando kaj donis kvar teatrajn prezentojn; la Pupteatro de Cluj kaj la Pupteatro de Ploieşti, Rumanio, gastis en Jugoslavio en septembro 1971 kaj aprilo 1972 kun entute 20 teatraj prezentoj; la Pupteatro de Košice, Ĉeĥoslovakio, gastis en novembro 1971 en Danlando kaj ludis tie ok fojojn.

La signifo de pupteatraj prezentadoj en la Internacia Lingvo, precipe en la kadro de internaciaj festivaloj, estas plurobla. Por partopreni la artistoj devas havi kontentigan posedon de Esperanto. La uzo de unusola lingvo ebligas kontaktojn kaj interŝanĝon de pensoj. Al infanoj kun scio de Esperanto la pupteatraj prezentadoj havigas unikan okazon ĝui internaciajn artajn spektaklojn, speciale dediĉitajn ĝuste al ili. Ĉio ĉi sendube estas plia kontribuo al internacia kompreniĝo.

11.8 KURSOJ KAJ SEMINARIOJ SUR UNIVERSITATA NIVELO

11.8.1 Internacia Somera Universitato (ISU)

En la sfero de kulturaj interŝanĝoj sur universitata nivelo gvidan pozicion okupas Internacia Somera Universitato. Inter 1948 kaj 1972 inkluzive lekciis 91 profesoroj, docentoj kaj aliaj kvalifikitaj scienculoj en 25 sesioj pri 230 temoj apartenantaj al tri ĉefaj branĉoj: sociaj sciencoj kaj filozofio, naturaj sciencoj, literaturo kaj arto.

La historio, organiza strukturo kaj laboro de ISU estas pritraktitaj en Ĉap. 20.4.

11.8.2 Kursoj kaj Seminarioj

Granda nombro da kursoj kaj seminarioj kun prelegoj aŭ raportoj sur scienca nivelo okazas ĉiujare en diversaj landoj. Kelkaj el ili ricevis konstantan karakteron kaj pro sia aparta graveco meritas eksplicitan mencion.

Konataj estas la seminarioj sub la ĝenerala titolo *Sveda Somera Semajno,* okazintaj en Frostavallen (Höör), proksime de Malmö, Svedio, ses fojojn. Tiujn kulturajn aranĝojn ĉiam organizas Sveda Esperanto-Instituto, sub gvido de Jan Strönne, kaj Sveda Instituto por Kulturaj Interŝanĝoj kun Eksterlando (ŝtata institucio), kelkfoje ankaŭ en kunlaboro kun Sveda Nacia Unesko-Komisiono. La seminarioj okazas fine de julio aŭ komence de aŭgusto kaj kutime daŭras unu semajnon. Ĉiufoje estas traktata unu ĉeftemo, kiun pluraj lekciistoj, kompetentaj pri siaj respektivaj fakoj, prilumas el diversaj vidpunktoj. La prelegojn sekvas diskutoj, kaj la lasta kunveno estas dediĉita al ĝenerala debato pri la temaro.

En la unuaj du jaroj (1953 kaj 1954) la ĉeftemo estis „Internaciaj Kulturaj Interŝanĝoj"; en 1956 ĝi estis „Ĉefaj Obstakloj al Internacia Kompreniĝo kaj Kooperado"; en 1959 la seminario diskutis pri „Landoj

kaj Popoloj kun Speciala Atento al Orienta kaj Okcidenta Kulturaj Valoroj"; en 1962 la semajno estis dediĉita al Unesko kaj tri bazaj temoj estis pritraktitaj: „La Laboro de Unesko", „La Granda Projekto Oriento-Okcidento" kaj „Ĉefverkoj de la Monda Literaturo en la Internacia Lingvo"; fine, en 1972, la ĉefa temo estis „La Problemo de Komunikado en la Moderna Mondo kun Speciala Atento al la Situacio en Eŭropo".

La nombro de partoprenantoj kutime estas ĉ. 100 el ĉ. 15 ĝis 20 landoj, sed unuopajn prelegojn kaj diskutojn ofte ĉeestas gastoj el ĉirkaŭaj lokoj, kelkfoje kvindeko da ili.

Similajn seminariojn, ofte sur universitata nivelo, organizas Germana Esperanto-Junularo (GEJ) sub la ĝenerala titolo *Internacia Seminario de GEJ*. Tiuj seminarioj kutime okazas en junularaj gastejoj, ĉiam fine de la kalendara jaro kaj komence de la nova. Partoprenas ĝis cento da gejunuloj, multaj el ili gestudentoj, el diversaj landoj (10-15). Prelegas aŭ rekonitaj pli aĝaj fakuloj aŭ gestudentoj. La temaro estas varia kaj rilatas al aktualaj internaciaj demandoj, ekzemple „Usono kaj Soveta Unio — Ĉu eblas Kunekzistado de la Du Kontraŭaj Sistemoj?" (1961-62), aŭ „Ĉu Naciismon Sekvos Internaciismo?" (1962-63), k.s. En Hamburgo (1971-72) oni iom ŝanĝis la sistemon de la laboro: la du ĉefaj temoj — „Komputera Kalkulado" kaj „Solvo de Konfliktoj pere de Pacesplorado" — estis pritraktitaj, post la enkondukaj prelegoj, en du grupoj dum la semajno; tri pliaj grupoj pridiskutis aliajn demandojn. La lasta, 16-a seminario okazis fine de decembro 1972 kaj komence de januaro 1973 en junular-gastejo de Darmstadt. La ĉefa temo estis „La Manipulita Homo".

Iom alian karakteron havas *Somera Esperanto-Universitato* (SEU) en Gyula (Hungario), kies iniciatinto kaj ĉefa organizanto estas Prof. Imre Kádár. Ankaŭ tie parolas kvalifikitaj lekciistoj de diversaj landoj, sed la prelegaro kutime ne estas centrita je unu ĉeftemo. La varieco de la temoj, ofte popularscience prezentitaj, la foresto de limigoj rilate aĝon, kiel ankaŭ diversaj distraj kulturaj programoj ebligas pli amasan partoprenon. Ĝis inkluzive 1972 entute okazis 10 sesioj, la lasta de la 9-a ĝis la 15-a de julio 1972. Al tiu jubilea sesio aliĝis 404 personoj el 13 landoj, kaj partoprenis 387 kursanoj el 12 landoj. Ĉi estis unu el la plej sukcesaj.

Someraj Universitataj Kursoj estas tute nova iniciato. La unua kurso okazis en la kampuso de la universitato de Lieĝo (Liège) en Belgio de la 30-a de julio ĝis la 27-a de aŭgusto 1972. La Organiza Komitato estis gvidata de Prof. E. Natalis, emerita profesoro de la Universitato de Lieĝo, kaj A. Heck, asistento en la sama universitato. En la honora komitato troviĝis 22 personoj, inter kiuj Prof. M. Welsch,

Rektoro de la Universitato de Lieĝo, la prezidantoj de ambaŭ Ĉambroj de la Belga Parlamento, la Vicĉefministro, pluraj ministroj kaj aliaj figuroj de la publika vivo. La studprogramo konsistis el du partoj: lingvistiko kaj medicinaj sciencoj; en ĉiu el ili lekciis profesoroj kaj aliaj universitataj prelegistoj pri temoj el siaj fakoj. La lekcioj okazis en la matenoj kaj la praktikaj ekzercoj posttagmeze. La praktikajn ekzercojn kompletigis studvizitoj de la gestudentoj en institucioj, laboratorioj, fabrikoj kaj muzeoj. Kolokvoj okazis en formo de diskuto sub la direkto de la prezidanta lekciisto. Biblioteko kun libroj pri ĉiuj instruataj fakoj estis je dispono de la kursoj. Partoprenis 67 gekursanoj el 16 landoj.

11.8.3 Gravaj Sporadaj Konferencoj

Aliaj internaciaj konferencoj kaj seminarioj sur universitata nivelo okazas sporade, kutime en ligo kun la bezono pritrakti iun aktualan demandon. Almenaŭ tri el ili elstaras pro sia aparta graveco.

La unua estis *Internacia Seminario pri la Kulturoj kaj Civilizoj de la Mondo,* okazinta de la 14-a ĝis la 16-a de julio 1954 en la Kultur-domo de la Franca Esperantista Kooperativo, iama kastelo Grésillon, Baugé, Francio. La seminario, organizita de la Kooperativo, troviĝis sub aŭspicio de UEA. Ĝia celo estis doni ĝeneralan superrigardon pri la laboro de Unesko por reciproka interkonigo de la kulturoj kaj civilizoj, kaj pri la rolo de la Internacia Lingvo kaj agadoj de la Esperanto-organizaĵoj en tiu sama direkto. Kvin fakuloj prezentis la temaron en 15 lekcioj, kiujn sekvis diskutoj. Partoprenis sesdeko da seminarianoj el 13 nacioj.

Rimarkindajn rezultojn atingis *Seminario Oriento-Okcidento,* okazinta en la Universitato de Londono de la 2-a ĝis la 5-a de aŭgusto 1961. Dek specialistoj pri specifaj aspektoj de okcidentaj kaj orientaj kulturoj faris entute 20 lekciojn. Inter la sesdek partoprenantoj el 15 landoj, pluraj estis el Azio, dum aliaj pasigis longajn periodojn en diversaj landoj de Azio kaj Afriko. Tio ebligis diskutojn sur tre alta nivelo surbaze de bona kono de faktoj. La materialoj de la seminario helpis plibonigi la laboron de UEA por la progresigo de kulturaj interŝanĝoj inter Oriento kaj Okcidento pere de la Internacia Lingvo.

Plia grava renkontiĝo estis *Unua Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco.* Ĝi okazis en la Teknika Altlernejo en Kopenhago de la 5-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1962. La konferenco estis kunvokita de grupo da sciencistoj sub prezido de D-ro Paul Neergaard, sekciestro de la Ŝtata Plantpatologia Servo en Kopenhago,

antaŭe profesoro pri plantpatologio en la Amerika Universitato de Beirut. La organiza komitato direktis inviton al sciencistoj-specialistoj de diversaj landoj partopreni. Fakte, 61 sciencistoj kaj observantoj el 13 landoj ĉeestis persone, dum aliaj sendis skribe siajn raportojn kaj rimarkojn. Entute 18 sciencistoj prezentis al la konferenco 22 raportojn. La enkondukan raporton pri „La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj" faris Prof. D-ro I. Lapenna [2]. La aliaj raportoj rilatis al tuta aro da demandoj, inter ili al uzo de lingvoj en medicinaj periodaĵoj en la mondo (D-ro A. Albault), aŭtomata tradukado (D-ro V. Sadler), la lingva problemo en geografio (Prof. D. L. Armand), la lingva problemo en biologio kaj agronomio (D-ro P. Neergaard), lingvaj malsamecoj rilate anatomiajn priskribojn (D-ro Pablo Santamaria-Arnaiz), lingvaj obstakloj en matematiko kaj fizikaj sciencoj (Prof. B. Popović) kaj uzo de Esperanto en astronomio (Prof. Y. Väisälä).

Aparte menciinda estas la Rezolucio, kiun la Scienca Konsilantaro de la Geografia Instituto de la Soveta Akademio de Sciencoj prezentis al la konferenco. La Rezolucio emfazas la valoron de Esperanto por interŝanĝo de informoj inter sciencistoj-geografoj. En la Instituto grupo da sciencistoj esploras la praktikan uzon de la Internacia Lingvo en geografio.

En la diskuto la konferenco esploris la faktan nuntempan aplikadon de la naciaj lingvoj en la scienco, la ĝisnunan uzon de Esperanto en geografio, biologio, medicino, matematiko, fiziko, psikologio, juro kaj aliaj branĉoj. La ĉefaj raportoj estis poste publikigitaj en diversaj sciencaj periodaĵoj, interalie en *Scienca Revuo*.

Ĉi tie necesas aldoni, ke kelkaj el la multaj internaciaj renkontiĝoj de TEJO, la junulara sekcio de UEA, havis karakteron de seminarioj sur universitata nivelo. Tia, ekzemple, estis la seminario *Lingvo kaj Kulturo,* okazinta en Strasburgo (Francio) de la 4-a ĝis la 9-a de septembro 1971. Partoprenis dudeko da reprezentantoj de diversaj junularaj Esperanto-organizaĵoj kaj de neesperantistaj unuiĝoj. La seminario detale pridiskutis 15 raportojn kaj studojn. La laborlingvoj estis la angla, Esperanto kaj la franca. Raportaro de proksimume 140 paĝoj poste estis publikigita en Esperanto kaj en kvar naciaj lingvoj: la angla, franca, germana kaj nederlanda, en la eldono de *Stichting voor Internationale Kommunikatie,* Amsterdam. La seminario *Lingvo kaj Politiko* okazis en Parizo de la 10-a ĝis la 16-a de julio 1972. Kvankam partoprenis nur 15 personoj, tamen ankaŭ ĝi estis sukcesa pro la kompetentaj lekciistoj kaj altnivela

2. Tiu raporto estis poste publikigita kiel dokumento de CED A/II/5 en Esperanto, en la angla (du eldonoj) kaj en aliaj lingvoj.

diskuto. Ambaŭ seminarioj estis organizitaj de la Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO, kies animo estis Hans Bakker.

11.9 ALIAJ FORMOJ

11.9.1 Ĝeneralaj Kulturaj Aranĝoj

Milojn da diversspecaj kulturaj aranĝoj organizas la lokaj Esperanto-societoj tra la tuta jaro: prelegoj, literaturaj vesperoj, kantoroj, kelkloke parolataj gazetoj, k.s. Aliaj kulturaj programoj estas realigataj sur landa nivelo, precipe okaze de landaj kongresoj kaj renkontiĝoj, kiuj ĉiam pli ricevas internacian karakteron pro la partopreno, kelkfoje multnombra, de eksterlandaj gastoj. Siavice, ne nur la universalaj kongresoj, organizataj de UEA, kaj la junularaj Esperanto-kongresoj, prizorgataj de TEJO, sed ankaŭ la kongresoj de SAT kaj de diversaj internaciaj fakaj Esperanto-organizaĵoj kutime havas apartajn kulturajn aranĝojn en la kadro de siaj respektivaj programoj.

Tute specialan lokon okupas la konstantaj, ĉiujaraj kulturaj programoj en la Kulturdomo Grésillon, Baugé, Francio, en granda proksimeco de la mondfamaj kasteloj en la valo de Loire. Ekde 1952, kiam la Kultura Asocio de la kastelo Grésillon sukcesis akiri tiun imponan konstruaĵon kaj komenci la laboron, regule okazas tie diversaj kulturaj aranĝoj, dividitaj en pluraj periodoj. La sezono kutime komenciĝas en aprilo kaj daŭras ĝis la fino de septembro. Dum tiu tempo okazas diversaj studaj, edukaj kaj ĝenerale kulturaj semajnoj aŭ pli longdaŭraj renkontiĝoj, tiel ke la partoprenantaro ŝanĝiĝas de unu periodo al alia. Aldone, estas organizataj diversgradaj kursoj de la Internacia Lingvo, aŭ kursoj de la franca lingvo instruata en Esperanto. Ĉiu laborsezono konsistas meze el ĉ. 5-6 periodoj, kio signifas, ke en 21 jaroj da aktivado en Grésillon entute okazis pli ol 100 internaciaj instruaj, edukaj kaj kulturaj kursoj, seminarioj, kolokvoj kaj similaj aranĝoj, kiujn partoprenis ĉ. 6.000-7.000 personoj.

Koncizaj informoj pri la organiza strukturo kaj laboro de tiu ĉi institucio troviĝas en Ĉap. 20.7.

11.9.2 Prelegvojaĝoj

La unuaj prelegvojaĝoj per Esperanto okazis jam antaŭ la Unua Mondmilito. La plej notindaj estas tiuj de I. Krestanov (Bulgaro), A. Pitlik (Ĉeho), Prof. D-ro E. Privat (Sviso) kaj D. Parrish (Usonano). Tiu lasta ricevis apartan komision de la Komerca Ĉambro en Los

Angeles travojaĝi Eŭropon kaj diskonigi ĉie per prelegoj en la Internacia Lingvo kaj lumbildoj la belaĵojn de Usono. Li vizitis 25 landojn, parolis ĉie en Esperanto, kaj havis grandan sukceson.

Post la jaro 1930 okazis multaj prelegvojaĝoj, kiuj havis similan celon: diskonigi la kulturon, tradiciojn kaj naturajn belaĵojn de la koncernaj landoj. La plej gravaj el tiuj vojaĝoj estas: la prelegvojaĝoj de H. Steiner, R. Frey, R. Cech (Aŭstroj); D-ro J. Lukács, D-ro S. Puskás, J. Baghy, D-ro F. Szilágyi kaj T. Czitrom (Hungaroj); T. Morariu (Rumano); L. Sinha (Hindo); K. Ajayi (Nigeriano); M. Raden (Javano, Indonezio). La plej grava prelegvojaĝo, iam entreprenita per Esperanto kaj tre verŝajne entute, estis tiu de J. Scherer (Usonano). Lia vojaĝo daŭris de 1930 ĝis 1932. Li ĉirkaŭiris la tutan mondon kaj vizitis 41 landojn. Dum la vojaĝo li faris entute 322 prelegojn kaj paroladojn, kiujn aŭskultis pluraj dekmiloj da personoj.

Post la Dua Mondmilito la plej grava prelegvojaĝo estis tiu de Prof. D-ro Ivo Lapenna (Kroato, Jugoslavio, nun en Londono), kiu en la jaroj 1949-1951 vizitis ĉ. 150 urbojn de Italio, Francio, Belgio, Nederlando, Britio kaj Islando. Li faris pli ol 300 prelegojn ĉu por la larĝa publiko pri Jugoslavio, ĉu en universitatoj pri sia fako, nome pri internaciaj rilatoj kaj internacia juro. La prelegojn entute ĉeestis ĉ. 30.000 personoj. Aldone al tiuj publikaj prelegoj, ĉiam en Esperanto kun tradukoj en la respektivajn naciajn lingvojn, Prof. Lapenna faris ankaŭ prelegojn en la lokaj societoj kaj havis multnombrajn kontaktojn kun la funkciuloj de la Esperanto-organizaĵoj, kio helpis la konstruadon de la nuntempa moderna UEA (v. ankaŭ Ĉap. 18, precipe 18.5.3). Lia vojaĝo estis organizita de UEA.

Aliaj notindaj prelegvojaĝoj estis tiu de B. Potts (ĵurnalisto, Novzelandano) en 1956-57, organizita de J. Strönne laŭ komisio de UEA, dum kiu li vizitis 11 landojn de Eŭropo kaj prelegis pri la prahistorio de Novzelando; tiu de Kaĵino joŝiko (Japanino), organizita de UEA, kiu en 1959-60 prelegis en eŭropaj landoj pri Japanio. Aparte sukcesa estis la prelegvojaĝo de Itoo eizo (Japano) en 1959-60. Li faris 156 prelegojn en 106 urboj de 18 eŭropaj landoj. La ĉeftemo estis „Japanio Malnova kaj Nuntempa". Entute ĉeestis ĉ. 11.000 personoj. En 1963 du junaj Japanoj, Kjotaro Deguĉi kaj Joŝimi Umeda, prelegis en 60 urboj de 13 landoj: Hongkongo, Egiptio, Usono, pluraj en orienta kaj okcidenta Eŭropo. Ili prelegis ĉefe pri noo-dramo kaj japana kulturo ĝenerale. Ili ankaŭ prezentis filmon kaj lumbildojn. Deguĉi kaj Umeda faris entute 54 prelegojn, kiujn ĉeestis ĉ. 14.000 personoj.

Laŭ la invito de la universitatoj en Turku, Tampere kaj Jyväskylä (Finnlando), en printempo 1971 Prof. D-ro I. Lapenna (Universitato

de Londono) prelegis en Esperanto kun sinsekva finnlingva traduko por la studentaro kaj profesoroj de tiuj universitatoj pri kvin fakaj temoj rilatantaj al internacia juro kaj kompara orient-eŭropa juro. En la historio de la Internacia Lingvo verŝajne ĝi estas la unua tiaspeca prelegaro en la Internacia Lingvo kun interpreto en la nacia, farita laŭ oficiala invito de la universitataj instancoj.

Krom la menciitaj grandaj prelegvojaĝoj, anticipe planitaj kaj organizitaj, en la lokaj Esperanto-societoj, precipe en la grandaj centroj, ĉiujare okazas multaj prelegoj de eksterlandanoj pri kulturaj temoj. Tiucele estas utiligataj la okazaj vizitoj de kompetentaj prelegantoj el aliaj landoj.

La rolo de esperantlingvaj prelegoj por reciproka aprezado de kulturoj kaj civilizoj abunde transpasas la kadrojn de la ĉeestantaro. Tio unuavice rilatas al la grandaj prelegvojaĝoj. Raportoj pri la prelegoj, informoj kaj intervjuoj kun la prelegantoj en la nacilingva gazetaro, radio kaj televido atingas la plej vastajn popoltavolojn kaj donas plian valoron al tiu formo de kulturaj interŝanĝoj. Se dum unusola prelegvojaĝo ĉ. 10.000 personoj fakte aŭskultis la koncernajn prelegojn, oni povas sen troigo taksi, ke milionoj ricevis pli aŭ malpli detalajn informojn pri la temo tra la rimedoj de amaskomunikado.

11.9.3 Sonbendaj Programoj kaj Personaj Kontaktoj

La populariĝo de magnetofono ebligis plian interesan aplikon de Esperanto por kulturaj celoj. En la komenco nur unuopaj posedantoj de magnetofonoj kutimis interŝanĝi sonbendojn, entenantajn ĉefe personajn mesaĝojn. Tiu formo de internacia komunikado daŭre evoluis kaj oni ekuzis la magnetofonon ankaŭ por interŝanĝoj de tutaj programoj kun kultura enhavo.

En 1957, laŭ la iniciato de Rüdiger Eichholz el Kanado, estis fondita *Magnetofona Servo de UEA* kun la celo organizi la kolektadon kaj distribuadon de sonbende registritaj prelegoj, radioelsendoj, kantoj, teatraĵoj, humoraĵoj, kursoj kaj ĝenerale interesaj sondokumentoj en la Internacia Lingvo aŭ, parte, pri ĝi. R. Eichholz estis nomita komisiito de tiu servo kaj li plu tre sukcese gvidas ĝin.

Ĝis la fino de 1972 estis kolektitaj precize 292 sonbendoj, el kiuj tre multaj havas nete kulturan enhavon. Jen nur kelkaj ekzemploj, kiuj montras la variecon de la programoj: „Knud Rasmussen kaj la Eskima Poezio" (P. Thorsen); „Ses Literaturaj Programoj" (Pola Radio); „Maoriaj Kantoj" (prezentitaj de Wiki Puketapu); „Brita Vespero" kun folkloraj kantoj el Anglio kaj Irlando, kimraj kantoj (Kimra Virvoĉa Ĥoro), pluraj kantoj originale verkitaj en Esperanto, eroj el la poezio de Shakespeare (deklamoj de N. Rytjkov), poemo de R. Burns (deklamo de W. Auld); „Estonio Salutas

Vin" (rakontoj kaj muziko el SSR Estonio); „La Popola Respubliko Makedonio" (J. Ŝlat); „Renkontiĝo kun Varsovio" kaj „Historio kaj Deveno de la Krakova Trumpetvoko" (Pola Radio); La Unua Amo", komedio de B. Nušić (Radio Zagreb); „La Malbone Edukita Papago" kaj „La Fantomo" (humoraĵoj de P. Ĝunio); „La Rido de la Mondo" (A. Starke); „Pacaj Metodoj de Interŝtata Kunvivado" (A. Baur); „La Grandeco de L. L. Zamenhof", „Internacia Juro kaj Mondpolitiko", pluraj aliaj prelegoj (I. Lapenna); granda repertuaro de kompletaj teatraĵoj prezentitaj de Internacia Arta Teatro; inaŭguraj paroladoj okaze de universalaj kongresoj; prelegoj en Internacia Somera Universitato, belartaj kaj oratoraj konkursoj de UEA; kaj multaj aliaj programoj.

Kopiojn de ĉiuj sonbendoj oni facile havigas de la Magnetofona Servo laŭ tarifo, intence tre malalta por ebligi kiel eble plej vastajn internaciajn interŝanĝojn de surbendigitaj kulturaj programoj. Kvankam la Servo havas ĝeneralan valoron por ĉiuj, tamen ĝia funkciado, bonege organizita, havas speciale grandan valoron por la lokaj Esperanto-societoj, kiuj povas per sonbendaj kulturaj programoj riĉigi la enhavon de siaj kunvenoj.

Fortaj kaj multnombraj fadenoj ligas la personojn, kiuj parolas la Internacian Lingvon, ankaŭ per vasta *internacia korespondado.* Miloj da personoj tra la mondo ĉiutage korespondas en Esperanto, kreante ankaŭ tiamaniere reton de internacia komprenemo kaj amikeco. La korespondado, kompreneble, koncernas plej diversajn temojn, ne malofte kun kultura enhavo. De la infanoj en diversaj lernejoj, kiuj interŝanĝas eĉ nur ilustritajn poŝtkartojn, ĝis sciencistoj, utiligantaj Esperanton por sia faka laboro. Estas maleble eĉ partete doni ekzemplojn pri la multflankeco de la utiligo de Esperanto por tiuj celoj. Sufiĉos nur mencii, ke internaciaj ekspozicioj de infandesegnaĵoj povis esti aranĝitaj dank' al la Internacia Lingvo; ke scienca materialo por doktoraj tezoj povis esti kolektita dank' al Esperanto; ke studoj, artikoloj kaj prelegoj povis esti verkitaj dank' al informoj ricevitaj per Esperanto; ke eĉ retrovado de parencoj kaj amikoj ofte okazis tra la ligoj, kiujn kreas la Internacia Lingvo. Sed tio jam kondukas al pure pragmataj aplikoj.

11.10 ESENCA BIBLIOGRAFIO

Albault, A., „Angoroj". *Esperanto,* 1964, n-ro 7-8, p. 124.
Bernard, R., „Nia Teatro". *La Praktiko,* 1965, n-ro 3, p. 35-38.
Lapenna, I. (red.), *La Internacia Lingvo (Faktoj pri Esperanto).* Londono 1954.
Tiŝljar, Z., „La Pupoj Parolas Esperanton". *La Suda Stelo,* 1968, n-ro 3, p. 64.

Tortel, D-ro, „La Teatro en la 49-a UK". *Monda Kulturo*, 1964, aŭtuno, p. 275-277.

Periodaĵoj kaj Dokumentoj:

Dokumentoj de CED, precipe en la Serio G, Sekcioj (II), (III) kaj (VI); Serioj I/III kaj J/II.
Esperanto, ĉiuj septembraj kaj oktobraj numeroj ekde 1950; 1971, n-ro 6, p. 103.
Kongresa Libro de la 54-a UK de Esperanto en Helsinki, 1969.
Regularoj pri Internacia Somera Universitato, Belartaj Konkursoj, Oratora Konkurso por la Junularo.
Atentigo: Vidu ankaŭ la noton en la fino de la Tria Parto pri la ĉefaj fontoj por verkado de Ĉapitroj 11, 12 kaj 13.

ĈAPITRO 12

UZO POR PRAKTIKAJ CELOJ

12.1 IOM PRI PRAGMATISMO

Ne malofte aŭdiĝas demando, ĉu la scio de Esperanto donas praktikan utilon.

Antaŭ ol respondi necesas diri kelkajn vortojn pri la senco de la demando, kiun tre verŝajne ĉiu individuo rigardas el malsama vidpunkto. En la plej ĝenerala senco de la vorto ĉia ajn uzo de Esperanto por kia ajn formo de komunikado, ekde la plej ordinara konversacio ĝis interŝanĝo de pensoj sur scienca nivelo, signifas fakte praktikan utiligon de la lingvo. La alia ekstremo estas kompreni la praktikan utilecon nur el vidpunkto de pure materiaj gajnoj, esprimeblaj en monaj ekvivalentoj, kiujn prezentas la scio de la lingvo. Inter la plej simpla komunika rolo, unuflanke, kaj la „mona valoro" de la lingvoscio, aliflanke, troviĝas longa, seninterrompa ĉeno da ĉiaspecaj praktikaj aplikoj. De la personaj preferoj multe dependas, ĉu kaj ĝis kiu grado tiu aŭ alia aspekto de praktika utiligo estas aprezata.

„Pragmatismo", ofte tro unuflanke komprenata, en tiu ĉi kunteksto estas fakte nenio alia ol rigardado al la lingvo el vidpunkto de ĝia praktika valoro. Se tiel, pragmatismo por iu unuavice signifas gajni monon per Esperanto, ricevi turisman informon aŭ legi menuon en la Internacia Lingvo — kio ja sendube estas utila —, sed por alia ĝi povas antaŭ ĉio signifi la eblecon legi bonan originalajon, aŭ literaturan tradukon, aŭ fakan verkon. Eĉ propagandado de siaj propraj sociaj kaj politikaj idealoj, aŭ disvastigado de religiaj kredoj, estas fakte siaspeca pragmatismo. En tiu ĉi senco ankaŭ la utiligo de Esperanto por kulturaj celoj efektive egalas al praktika apliko de

la lingvo por ĉiu klera, kultura homo.

Evidente, la du sferoj de aplikoj — kulturaj kaj praktikaj — estas tiom interplektitaj, ke tre vasta zono havas samtempe kaj kulturan kaj praktikan valoron, kio malebligas fiksi klaran dividlinion inter ili. Aliflanke, ekzistas tuta aro da sferoj, en kiuj aŭ la praktika flanko en la strikta senco de la vorto esprimiĝas pli forte ol la kultura, aŭ la pure pragmata aspekto estas preskaŭ ekskluziva. Montriĝis, do, oportune prezenti la ĉefajn trajtojn de tiu grupo en aparta ĉapitro.

12.2 DELEGITA RETO

12.2.1 Origino

Post la Unua Universala Kongreso de Esperanto (1905) sentiĝis ĉiam pli, ke Esperanto sen reala internacia praktikado ne havos altirpovon por la reale pensanta mondo. La ideoj kristaliĝis en propono farita de A. Carles al la Dua Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo (1906). Tiu propono tekstis:

> Estus oportune havi en multaj urboj konsulojn, al kiuj oni povus ĉiam sukcese sin turni kaj de kiuj oni povus ricevi ĉiajn petitajn sciigojn, eĉ privatajn informojn pri komercistoj. Ankaŭ la vojaĝantoj ĉiam scius, kien ili povus sin prezenti por ricevi bonan akcepton kaj ĉiujn postulitajn informojn, ne ĝenante iun ajn.

La Kongreso rekomendis al la societoj kaj grupoj realigi la proponon kie ajn tio estas ebla. Tiu ĉi bonintenca forŝovo de la propono al la lokaj Esperanto-grupoj malatentis la neceson de speciala organizo kaj de aparta centro. Tiamaniere la propono estis fakte entombigita, almenaŭ provizore.

Nur poste, kiam estis fondita UEA en 1908, la ideo estis realigita, sed la nomo „konsulo" ne estis akceptita, ĉar ĝi estis konfuza kaj neoportuna pro la sama titolo, kiun havas la ŝtataj konsuloj; anstataŭ tiu netaŭga nomo, estis elektita alia, nome „delegito" de UEA. Ĝi restis senŝanĝa ĝis hodiaŭ. Nur kvar monatojn post la fondiĝo, en aŭgusto 1908, UEA jam havis 200 delegitojn, 80 vicdelegitojn kaj 100 subdelegitojn.

12.2.2 Organiza Strukturo

La delegita sistemo estis plurfoje ŝanĝita kaj plibonigita. Nuntempe la delegita reto de UEA funkcias konforme al la principoj entenataj en la Ĝenerala Regularo de UEA kaj en la Regularo pri la Servo de Informpeto al UEA-delegitoj.

12.2 DELEGITA RETO

Delegito estas persono, kiu parolas la Internacian Lingvon, estas individua membro-abonanto de UEA (sekve ricevas la Jarlibron kaj la oficialan organon de la Asocio) kaj deklaras sin preta plenumi senpage diversajn servojn, fiksitajn en la Statuto kaj en la du Regularoj. La delegitoj estas elektataj aŭ nomataj ĉiun trian jaron. En la landoj, kies Esperanto-asocioj estas membroj de UEA, la koncerna landa asocio nomas aŭ nomigas la delegitojn, interkonsente kun la ĉefdelegito. En okazo de malkonsento, decidas la Estraro de UEA. En la aliaj landoj la delegitoj estas nomataj de la ĉefdelegito, de la peranto aŭ de la direktoro de la CO de UEA, se en la loko loĝas malpli ol 10 individuaj membroj. En regionoj, kie ekzistas minimume 10 individuaj membroj, ili rajtas okazigi kunvenon kaj mem elekti la delegiton.

Ĉefdelegitoj prizorgas la administradon en siaj respektivaj regionoj, se la koncernaj landaj asocioj mem ne faras tion. En lando, kies Esperanto-organizaĵo aliĝis al UEA, la ĉefdelegito estas nomata de la landa asocio interkonsente kun la ĝenerala sekretario. En lando, kies asocio ne aliĝis, la direktoro de la CO nomas, se necese, ĉefdelegiton aŭ peranton. Peranto, kies devoj ĝenerale egalas al tiuj de ĉefdelegito, kutime estas nomata en lando kun malpli ol dek kvin delegitoj.

En unu loko estas ĉiam nomata nur unu delegito (D) kaj, se necese, pluraj vicdelegitoj (VD), fakdelegitoj (FD) aŭ alispecaj delegitoj. Se ne necesas fari distingon inter la diversaj specoj, ili ĉiuj estas rigardataj kiel delegitoj (D) de UEA.

Delegito estas la ĉefa reprezentanto de UEA en sia loko aŭ regiono. Li respondecas pri la funkciado de la servoj. Vicdelegito helpas kaj anstataŭas la delegiton, kaj la reguloj starigitaj por la delegitoj validas laŭsence ankaŭ por la vicdelegitoj. Fakaj delegitoj estas elektataj pro siaj spertoj, kaj respondas al tiurilataj informpetoj.

La nomoj de ĉiuj ĉefdelegitoj, perantoj, delegitoj, vicdelegitoj kaj fakdelegitoj aperas ĉiujare en la oficiala *Jarlibro* de UEA. Ili estas ordigitaj laŭ la alfabeta ordo de la landoj kaj, en la kadro de ĉiu lando, de la lokoj. Krome, aparta listo de fakoj indikas en kiu loko troviĝas fakdelegito por la koncerna fako. Tiamaniere, la adreso de kiu ajn delegito estas facile trovebla.

En la jaro 1952 UEA havis en 61 landoj 1.025 delegitojn, 182 vicdelegitojn kaj 811 fakdelegitojn, do entute 2.018 diversajn delegitojn. Laŭ la *Jarlibro* de UEA por 1973, en 1972 funkciis 1.318 delegitoj, 195 vicdelegitoj, 62 junularaj delegitoj kaj 1.981 fakdelegitoj, entute 3.556 delegitoj en 65 landoj. La progreso estas tre kontentiga, vere rimarkinda rilate la nombron de FD. Ankaŭ la nombro de reprezentitaj fakoj altiĝis. Ĉiuj, kompreneble, estas gravaj el tiu aŭ alia vid-

punkto, sed elstaras la jenaj: arkitekturo, astronomio, bankaj aferoj, edukado, ekonomio, elektrotekniko, fervojo, filatelo, filozofio, fiziko, geografio, historio, industrio, junularaj aferoj, juro, ĵurnalismo, kemio, komerco, konstruado, lingvistiko, medicino, muziko, PTT (poŝto-telefono-telegrafo), radio, religio, skoltismo, sociologio, SOS-aŭto-servo, sporto, turismo.

12.2.3 Servoj

Ĉiu membro de UEA rajtas uzi la servojn de la delegita reto. La servoj mem estas senpagaj, sed la uzanto devas kompensi la elspezojn de la delegito. Oni rajtas peti informojn pri komerco, industrio, trafiko, laboro, dungo, salajroj, turismo, instruado, junulaj kaj studentaj aferoj, ktp. Informojn pri fakaj demandoj donas la koncernaj fakaj delegitoj. Oni ne rajtas peti informojn pri komerca pagokapablo, morala indeco de persono (konfidencaj informoj), sed tiukaze la delegito povas interrilati kun loka agentejo, kiu sin okupas pri tiaj aferoj. La delegitoj rajtas rifuzi servojn, kies plenumon ili rigardas kiel kontraŭan al siaj honoro kaj konscienco.

Principe, la servoj estas faritaj nur al la membroj aŭ pere de la membroj. Ĉefe tiucele la membroj de UEA ricevas plurajn t.n. membromarkojn: la petanto gluas la marketon sur la leteron kaj tiamaniere atestas sian membrecon. Kvankam la delegita reto unuavice servas la membraron, tamen nenio malhelpas delegiton fari servojn ankaŭ al aliaj personoj, tute egale ĉu ili parolas Esperanton aŭ ne. En ĉiu okazo la peto devas esti farita en la Internacia Lingvo, kiu estas la sola oficiala lingvo de UEA.

La delegitoj ĉiujare plenumas centojn, eĉ milojn da plej diversaj servoj. Ili multe helpas al vojaĝantoj, donante al ili konsilojn koncerne la restadon, vidindaĵojn de la urbo, konatiĝon kun la lokaj kulturaj institucioj, k.s. Ili donas informojn pri laborkondiĉoj, studeblecoj, vivkutimoj. Ili havigas sciigojn pri juraj demandoj, pri novaj akiraĵoj de la scienco en diversaj branĉoj. Doktoraj disertacioj kaj sciencaj verkoj estis ellaboritaj ne malofte dank' al havigo de konvena materialo fare de la fakaj delegitoj. Personoj perditaj en la vasta mondo estis retrovitaj pere de la delegitoj de UEA. Malfacile akireblaj medikamentoj estis havigitaj el aliaj landoj pere de la delegitoj. Komplikaj procesoj estis kontentige solvitaj dank' al la helpo de fakaj delegitoj pri juro. Nepriskribebla estas la varieco de la servoj faritaj per la potenca delegita reto de Universala Esperanto-Asocio. Tiuj sindonaj, servopretaj homoj ĉiutage solvas problemojn por personoj, kiujn plej ofte ili eĉ ne konas, kaj donas ne nur helpon kaj multe da ĝojo, sed kelkfoje eĉ savas homajn vivojn. La delegita reto estas vere unika institucio en la mondo. Neniu alia

organizaĵo, nacia aŭ internacia, registara aŭ neregistara, plenumas tiel akurate, tiel rapide, tiel sindone tiom da plej diversaj praktikaj servoj.

En la komenco en la CO de UEA troviĝis ampleksa sliparo, en kiu estis notita ĉiu unuopa servo. Tiu laboro estis farata ĝis la jaro 1939; ĝi montras, ke jam en tiu periodo la delegitoj ĉiujare plenumis de 12.000 ĝis 15.000 diversajn servojn, pruvitajn per dokumentoj. La ĉiam pli granda amplekso de la servoj kaj la fakto, ke la tuta maŝinaro jam rutine glate funkciadis, igis la gvidan instancon de UEA ĉesigi la pluan statistikadon. Estas tre verŝajne, ke nuntempe la delegita reto plenumas ĉiujare ĉ. 25.000 ĝis 30.000 servojn.

12.3 RADIO

12.3.1 Komenciĝoj

Disaŭdigoj en la Internacia Lingvo komenciĝis en 1922. En tiu jaro estis faritaj la unuaj provoj en Newark XYZ (Usono) kaj en Londono. En 1923 pluraj radio-stacioj elsendis la unuan fojon programojn en Esperanto: Moskvo (la 12-an de aprilo), Montreal kaj Rio de Janeiro. En 1924 aliaj stacioj disaŭdigis en Esperanto por la unua fojo: Praha la 31-an de januaro, Ĝenevo la 18-an de marto, Helsinki la 6-an de aprilo kaj Parizo la 7-an de aprilo.

Baldaŭ sekvis ĉiam pli oftaj kaj pli longaj elsendoj de diversaj radio-stacioj. Laŭ statistiko el 1934, ne tre fidinda, la antaŭan jaron (1933) entute 83 radio-stacioj en 14 landoj havis 1.774 elsendojn en Esperanto aŭ pri Esperanto. En tiu nombro plej kredeble estas inkluzivitaj ĉefe paroladetoj aŭ informoj en naciaj lingvoj pri Esperanto.

Antaŭ la Dua Mondmilito elstare altnivelajn kulturajn programojn disaŭdigis Radio Praha. Ĝi elsendis en Esperanto eĉ tutajn operojn, ekzemple la konatan *Vendita Fianĉino* de Smetana, kaj tutajn dramojn, ekzemple la dramon de K. Čapek *La Blanka Malsano*. La nazia invado de Ĉeĥoslovakio kaj la posta milito detruis tiujn promesplenajn komenciĝojn.

12.3.2 Postmilita Periodo

En la unuaj jaroj post la Dua Mondmilito Esperanto komencis pli vaste penetradi en la radion. Jam en 1945 ok radio-stacioj en sep landoj komencis la disaŭdigojn. Inter ili troviĝis Sofio, Praha, Ostrava kaj Varsovio. En 1946 12 radio-stacioj en 10 landoj havis programojn en Esperanto. En la listo aperas Bern por la unua fojo. Ekde tiu jaro

ĝis la momento, kiam tiuj ĉi linioj estas skribataj, Bern daŭrigis la elsendojn en la Internacia Lingvo.

En la unuaj postmilitaj jaroj pluraj radio-stacioj en Orienta Eŭropo havis ĉiutagajn elsendojn en Esperanto. Aldone al Sofio, Ostrava, Praha kaj Varsovio, kiuj komencis disaŭdigi regulajn programojn en Esperanto jam en 1945, en la postaj du jaroj aldoniĝis Hradec Kr. en 1946 kaj Budapeŝto en 1947. Praha eĉ havis du fojojn ĉiutage elsendojn en Esperanto kaj, krome, daŭrigante la antaŭmilitan tradicion, ĝi prezentis unufoje en la monato grandan kulturan programon en la Internacia Lingvo, dum kiu estis prezentataj dramoj kaj operoj.

Ankaŭ Radio Parizo havis ĉiutagajn elsendojn en Esperanto ekde 1948 ĝis aprilo 1950. Kvankam miloj da leteroj el ĉiuj partoj de la mondo, speciale el la landoj de Orienta Eŭropo, evidente montris la grandan interesiĝon por la elsendoj de Radio Parizo en Esperanto, tamen, pro manko de financaj rimedoj kaj verŝajne ankaŭ pro aliaj kaŭzoj, la direkcio ĉesigis tiujn ĉiutagajn elsendojn, samtempe kun la ĉesigo de la elsendoj en kelkaj aliaj lingvoj. La ĉesigo de la elsendoj de Radio Praha (septembro 1950), Ostrava (januaro 1950), Varsovio (junio 1950) kaj Sofio (en 1952) estas atribuenda al politikaj kaŭzoj, nome ĉefe al la t.n. „malvarma milito" kaj al tiutempa starpunkto de Soveta Unio rilate la Internacian Lingvon (v. Ĉap. 21.4).

Aliflanke, aliaj radio-stacioj enkondukis elsendojn en Esperanto. Komence de 1952 regule disaŭdigis esperantlingvajn programojn jenaj radio-stacioj: Bern (Svislando); Rabat (Maroko); Hilversum-Vara, Hilversum-KRO kaj Hilversum-NCRV (Nederlando); Lille kaj Parizo (Francio); Vieno kaj Graz (Aŭstrio); Gvatemalo (Gvatemalo); Romo (Italio); Madrid (Hispanio); Rio de Janeiro (Brazilo). En 1952 Radio Parizo elsendis ĉiusemajne nur kurson de Esperanto kaj daŭrigis tiun elsendon dum pluraj jaroj. Estas menciinde, ke Hilversum-Vara anoncis regule en Esperanto ankaŭ sian artan programon.

En 1952 CED komencis sekvi, pere de sia kunlaboranto por radio G. Larglantier, la evoluon ankaŭ sur tiu kampo. De jaro al jaro estas regule faritaj statistikoj kun precizaj indikoj pri la radio-stacioj, kiuj disaŭdigas en Esperanto, nombro de programoj, ilia daŭro por ĉiu unuopa stacio. La statistikoj prezentas interesajn bildojn ne nur pri la nombro de esperantlingvaj elsendoj, sed ankaŭ pri la fluktuadoj, tre ofte dependaj de la ĝenerala politika situacio en unuopaj landoj aŭ en internaciaj rilatoj. Montriĝas ankaŭ, ke kelkaj radio-stacioj konstante elsendas en la Internacia Lingvo, dum aliaj komencas la elsendojn, sed pro diversaj kaŭzoj ĉesigas ilin post kelka tempo.

La ŝanĝita politika atmosfero ebligis enkondukon aŭ reenkondukon

de esperantlingvaj programoj en plurajn gravajn radio-staciojn. Ekzemple, Sofio, kiu malaperis en 1952, reaperis en 1957 kaj ekde tiam havas seninterrompe regulajn programojn en Esperanto. Zagreb en Jugoslavio komencis disaŭdigi en Esperanto jam en 1953 kaj neniam ĉesigis siajn regulajn semajnajn elsendojn. Ljubljana, same en Jugoslavio, komencis la elsendojn en 1953, sed ĉesigis ilin en 1958; aliflanke, Beograd komencis en 1964, sed ne daŭrigis post 1968. En 1959 reaperis Varsovio; ĝi ĉiam pli vastigis siajn esperantlingvajn programojn, kiujn nuntempe ĉiutage aŭskultas tre granda nombro da personoj en multaj landoj. Radio Praha reaperis en 1963 kaj daŭrigis siajn programojn ĝis 1968, sed la voĉo de Ĉeĥoslovakio en Esperanto plu aŭdiĝas, ĉar en 1968 Bratislava komencis disaŭdigi kaj plu daŭrigas. En 1965 komenciĝis la radio-elsendoj de Pekino; ankaŭ ili plu okazas. La elsendoj de Radio Budapeŝto komenciĝis en 1966, ĉefe en ligo kun la UK de Esperanto en tiu urbo, kaj ĉesis la 28-an de februaro 1969. Fine, ankaŭ Soveta Unio komencis apliki la Internacian Lingvon en la radio: en 1970 komenciĝis la elsendoj de Radio Tallinn, kiuj bedaŭrinde malaperis en 1973.

Aldone al Radio Bern, aparte menciindaj pro la konstanteco de la regulaj elsendoj estas la radio-stacioj de Vieno (ekde 1947), Romo (1950), Valencia (1952), Zagreb (1953), Sofio (1957) kaj Varsovio (1959), kiuj ekde la menciitaj jaroj seninterrompe havis kaj plu havas programojn en Esperanto. Aliaj gravaj stacioj, kiuj dum longaj periodoj havis regulajn esperantlingvajn programojn estas: Hilversum (1951-1967), Rio de Janeiro (1945-1966), Stockholm (1956-1960).

Ne necesas prezenti la detalojn pri la esperantlingvaj elsendoj por ĉiu unuopa jaro. Sufiĉas doni iom pli da informoj pri la elsendoj en 1972, nome la lasta jaro antaŭ la finredakto de tiu ĉi libro:

En 1972 la nombro de stacioj estis 17 en 14 landoj, nome Vieno (Aŭstrio); Muritiba kaj Sorocaba (Brazilo); Sofio (Bulgario); Bratislava (Ĉeĥoslovakio); Pekino (Ĉinio); Clermont-Ferrand (Francio); Sabadell kaj Valencia (Hispanio); Romo (Italio); Zagreb (Jugoslavio); Tananarive (Malgaŝa Respubliko); Gdańsk kaj Varsovio (Pollando); Tallinn (Soveta Unio); Bern (Svislando); Columbus (Ohio, Usono).

Plej multajn elsendojn (732) havis Radio Varsovio, kiu, krome, prezentis 233 Esperantajn elsendojn en la t.n. „anguletoj dum nacilingvaj programoj". Radio Pekino estas la dua laŭ la nombro de elsendoj (312); Columbus (Usono) havis 300 elsendojn kaj Bern (Svislando) 208 en tiu jaro. Muritiba kaj Sorocaba, Clermont-Ferrand, Sabadell kaj Valencia, Romo, Zagreb kaj Gdańsk havis 52 elsendojn ĉiu.

Necesas aldoni la televidan kurson de Esperanto, kiun faris kaj prezentis en 1972 la nederlanda televida institucio Teleac. La kurso

konsistis el 52 elsendoj dum 30 minutoj ĉiu, du fojojn semajne. La kurso, do, entute daŭris 26 horojn.

El la radio-stacioj, kiuj disaŭdigis en 1971 programojn en Esperanto, Rosario (Argentino), Stoke-on-Trent (Britio) kaj Sherbrooke (Kanado) ĉesigis la elsendojn en 1972.

Jen, fine, resuma tabelo, kiu donas la plej koncizajn informojn pri la Esperanto-programoj en la radio dum la lastaj 20 jaroj:

STATISTIKA TRARIGARDO PRI LA ESPERANTO-ELSENDOJ EN LA PERIODO 1953-1972

Jaro	Nombro de Stacioj	Landoj	Programoj	Daŭro en horoj
1953	18	12	844	189
1954	14	11	1.012	231
1955	17	11	1.168	266
1956	22	12	1.428	346
1957	18	12	1.250	317
1958	19	11	1.560	460
1959	22	13	1.959	660
1960	22	13	1.668	525
1961	15	12	1.485	480
1962	20	13	1.677	542
1963	20	13	1.701	534
1964	22	11	1.622	518
1965	25	13	1.807	662
1966	23	15	2.290	796
1967	20	13	2.014	715
1968	18	14	2.416	853
1969	16	14	3.133	1.089
1970	19	16	2.837	967
1971	19	16	2.817	960
1972	17	14	2.354	875

(Postredakta noto: Por 1973 la respektivaj ciferoj estas 22, 12, 3.259 kaj 1.110. Komento en *Esperanto*, aprilo, 1974.)

Kiel oni vidas, la nombro de programoj kaj la daŭro en horoj ne ĉiam dependas de la nombro de radio-stacioj, kiuj disaŭdigas esperantlingvajn programojn en iu jaro. Ekzemple, en la lastaj 20 jaroj plej multe da radio-stacioj (25) havis Esperanto-elsendojn en 1965, sed en tiu jaro la nombro de programoj estis 1.807 en la daŭro de





Antaŭ la mikrofonoj de Radio Zagreb (maldekstre) kaj Radio Varsovio (dekstre) Esperanto estas jam delonge hejma lingvo. Zagreb elsendas en la Internacia Lingvo seninterrompe depost 1953, kaj Varsovio, kiu rekomencis esperantlingvajn elsendojn en 1958, fariĝis la ĉefa elsendanto en la Internacia Lingvo, kun plurfojaj programoj ĉiutage.



Esperanto jam delonge estas sukcese uzata en la internacia turismo.

662,50 horoj; aliflanke, en 1969 estis nur 16 radio-stacioj, sed ili kune, ĉefe dank' al Radio Varsovio, havis 3.133 programojn en la daŭro de 1.089 horoj. Rilate la nombron de stacioj la jaro 1965 estis rekorda, sed rilate la nombron de programoj kaj daŭron la jaro 1969 troviĝas sur la pinto.

La tabelo rilatas nur al regulaj esperantlingvaj elsendoj. Necesas preni en konsideron, ke ĉiujare multaj radio-stacioj havas okazajn programojn en Esperanto, kaj eĉ pli multaj disaŭdigas informojn, prelegojn, intervjuojn kaj diskutojn pri la Internacia Lingvo, precipe en ligo kun la universalaj kongresoj, diversaj internaciaj konferencoj, seminarioj kaj similaj renkontiĝoj, en kiuj Esperanto estas la sola oficiala lingvo.

12.4 KOMERCO KAJ INDUSTRIO

12.4.1 Konciza Historia Trarigardo

Estas klare, ke komuna lingvo, vaste uzata, signifus grandan faciligon por la internacia komerco, precipe por eldonado de prospektoj kaj reklamoj, komerca korespondado kaj intertraktado. Aldone al simpligo kaj raciigo de la komunikado, grandegaj financaj rimedoj estus ŝparitaj.

La komerca mondo iom post iom ekuzis la Internacian Lingvon por diversaj celoj, ĉefe por reklamado en Esperanto-periodaĵoj, por prospektoj kaj prezaroj precipe pri varoj, kiuj interesas la larĝajn tavolojn.

Universala Esperanto-Asocio komprenis la gravecon de la uzo de Esperanto en komerco kaj industrio, kaj klopodis krei praktikajn servojn ankaŭ en tiu sfero. Inter la delegitoj de UEA, jam en 1914 troviĝis 285 personoj apartenantaj al komerco, industrio kaj bankaferoj. El ili, 166 estis komercistoj, 15 agentoj, 47 komercoficistoj, 41 bankoficistoj kaj 16 industriistoj. En la oficiala organo de UEA troviĝis aparta rubriko, kiu enhavis ofertojn kaj proponojn pri vendotaj kaj aĉetotaj varoj. Poste la titolo de tiu rubriko estis ŝanĝita al „Internacia Komerco".

La komercaj servoj per Esperanto fariĝis ĉiam pli ampleksaj, kiel vidiĝas el statistiko, kunmetita laŭ la informoj, kiujn la komercaj delegitoj sendadis al la CO de UEA. La nombro de komercaj servoj kreskis de 1.120 en la jaro 1909 al 3.713 en la jaro 1913. La eksplodo de la milito en 1914 interrompis ankaŭ tiun utilan laboron.

Tre frue formiĝis apartaj komercaj fakaj grupoj. Jam en 1914 funkciis 10 komercaj fakgrupoj en 7 landoj. En tiu jaro 968 komercaj firmoj en 38 landoj havis inter la oficistaro almenaŭ po unu per-

sono, kiu sciis la Internacian Lingvon. Post la Unua Mondmilito Esperanto plu vastiĝis en komercaj medioj, kaj la nombro da personoj sciantaj la lingvon en diversaj entreprenoj tutcerte konsiderinde kreskis.

Ankaŭ kelkaj komercaj ĉambroj interesiĝis pri la afero. La Londona Komerca Ĉambro estis la unua, kiu apogis Esperanton. Ĝi deklaris sin favora en 1905 kaj jam en 1906 okazigis publikajn ekzamenojn pri la scio de la lingvo. Ĝi daŭrigis tiujn ekzamenojn ĝis 1930, kiam la *Royal Society of Arts* (Reĝa Societo pri Artoj) enkondukis ekzamenojn pri la scio de Esperanto kaj regule okazigas ilin ankaŭ nuntempe. Ĝis la jaro 1914 entute 63 komercaj ĉambroj esprimis sin favore al Esperanto. El ili, 51 estis francaj, 3 anglaj, 7 germanaj, 1 hispana kaj 1 usona. La kongreso de komercaj ĉambroj en Madrid rekomendis la instruadon de la lingvo. En 1917 la Londona Komerca Ĉambro presigis la broŝuron *A Common Commercial Language* (Komuna Komerca Lingvo). En la sama jaro estis fondita Brita Komitato pri Komuna Komerca Lingvo; ĝi eldonis pliajn 9.000 ekzemplerojn de la menciita broŝuro.

Post la Unua Mondmilito la Pariza Komerca Ĉambro studis la lingvan problemon en komerco. La 9-an de februaro 1921 André Baudet prezentis al la Pariza Komerca Ĉambro ampleksan raporton pri Esperanto kaj pri ĝia disvastigiteco. Surbaze de tiu raporto la Ĉambro akceptis rezolucion, en kiu ĝi rekonis la gravecon de la Internacia Lingvo, enkondukis ĝian instruadon kiel fakultativan objekton en sian propran komercan lernejon, kaj rekomendis ĝin al la komercaj ĉambroj de la mondo. Tiu rezolucio, kune kun la tuta raporto, estis poste sendita al la Ligo de Nacioj, kiu tiutempe okupiĝis pri la demando de komuna lingvo (pri tio v. ankaŭ Ĉap. 22).

En 1923, laŭ la invito de la Itala-Svisa Komerca Ĉambro en Ĝenevo, kaj sub patroneco de la Itala Ministro pri Industrio kaj Komerco, en Venecio okazis Internacia Konferenco por Komerca Helplingvo. La sama raporto de A. Baudet, prezentita pli frue al la Pariza Komerca Ĉambro, servis kiel bazo por la diskutoj. Laŭ la verko *Enciklopedio de Esperanto* (Budapest, 1934-1935), la Konferenco, en kiu sin reprezentigis (per personoj kun bona scio de Esperanto) 90 komercaj ĉambroj, 8 ministerioj pri komerco, 21 foiroj, 61 komercaj institutoj, entute el 27 landoj de 5 kontinentoj, uzis la Internacian Lingvon kaj akceptis kelkajn rezoluciojn rilate la utiligon de Esperanto en komerco, foiroj, radio kaj turismo. Unu el la rezolucioj estis simila al tiu akceptita de la Pariza Komerca Ĉambro.

Paralele kun tiuj rezolucioj favoraj al Esperanto, kaj aliaj apogoj fare de diversaj komercaj instancoj, vastiĝis la praktika aplikado de

la lingvo en komerco kaj industrio. Al tio helpis ankaŭ aparta *Komerca Terminaro,* kiu unue aperis en 1923 en la maja numero de la revuo *Internacia Komerco.* Poste, en 1926, aperis *Common Commercial Terms in Trade and Commerce* (Kutimaj Komercaj Terminoj en Metioj kaj Komerco), en 1927 *Komerca Vortaro Seslingva,* en la sama jaro *Komerca Vortaro en Esperanto* kaj *Varolisto en Esperanto.*

Frue diversaj firmoj komencis eldonadi prospektojn, prezarojn kaj katalogojn en Esperanto. En la jaro 1911 ekzistis 11 tiaj katalogoj. Ilia nombro relative rapide altiĝadis. Antaŭ la Unua Mondmilito ekzistis jam pluraj centoj da reklamoj, katalogoj kaj prezaroj en Esperanto, inter kiuj estas menciindaj tiuj de la farmacia firmo kaj fabriko Burroughs, Wellcome & Co., de la entrepreno Consett-Ferofabriko (36-paĝa), de la fotofabriko Hüttig A.S. en Dresdeno (48-paĝa), kiel ankaŭ „Prezaro de Novzelandaj Produktaĵoj de Carswell". La tiamaj konataj fabrikoj de skribmaŝinoj Ideal, Yost, Hammond kaj Oliver eldonis ilustritajn katalogojn. En 1910 aperis la unua prospekto pri aŭtomobiloj, eldonita de Clément Bayard en Parizo. Verŝajne la plej grandan sukceson antaŭ la Unua Mondmilito havis la prospekto de la Porcelan-Fabriko en Meissen (Germanio), kiu, pro reklamo en Esperanto-gazeto, ricevis konsiderindan mendon el Anglio. Alia germana firmo — Reiner el Berlino — publikigis en 1914, ke, post reklamoj en Esperanto-gazetoj, ĝi ricevis dum du monatoj 439 mendojn el 32 landoj. Tiuj kelkaj ekzemploj montras, ke prospektoj kaj reklamoj en Esperanto-gazetoj havis jam en tiu tempo bonan efikon.

Inter la du militoj la plimulto de la grandaj internaciaj foiroj unu post la alia ekuzis Esperanton ne nur por reklamado, sed ankaŭ por negoca korespondado. Kelkaj foiroj, ekzemple tiuj de Leipzig, Frankfurt, Budapeŝto, Lyon, Reichenberg, ktp. regule eldonadis afiŝojn, prospektojn, cirkulerojn, reklamajn glumarkojn ankaŭ en Esperanto.

En Esperanto aperadis ankaŭ komercaj periodaĵoj. Inter ili estas citindaj *Internacia Komerca Revuo,* kiun eldonadis D-ro H. Unger en Zürich (Svislando) de 1919-1922; *Internacia Komerco,* kiun redaktis H. Unger kaj R. Kreuz, kaj kiu aperadis de marto 1923 ĝis oktobro 1924 kiel aldono de *Esperanto Triumfonta;* kaj aliaj malpli grandaj. Dum iom da tempo en la organo de UEA *Esperanto* aperadis rubriko sub la titolo „Ekonomia Kuriero", kiun redaktis R. Kreuz (1925).

La politikaj eventoj en Eŭropo kaj la Dua Mondmilito interrompis tiun kontentigan disvastiĝon de Esperanto en la medioj de komerco kaj industrio, kio preskaŭ komplete ĉesigis la praktikan aplikadon de la lingvo sur tiu kampo dum pluraj jaroj.

12.4.2 Nuna Situacio

Post la Dua Mondmilito denove komenciĝis iom pli ampleksa utiligado de Esperanto por diversaj celoj en internacia komerco. La unuaj eblecoj por reestabli komercajn kontaktojn ankoraŭfoje ŝuldiĝas al UEA (IEL), kies *Jarlibro* enhavis nombron da fakdelegitoj por komerco kaj industrio jam en la eldono de 1945.

Paralele kun la ĝenerala disvastiĝado de la lingvo, grandiĝadis ankaŭ ĝia valoro por komerca reklamado kaj aliaj formoj de praktikaj aplikoj. Tio kaŭzis, ke kreskanta nombro da industriaj kaj komercaj firmoj denove ekuzis la lingvon por eldonado de *prospektoj* kaj por *reklamado* en la Esperanto-periodaĵoj. La nombro ne estas, nek povas esti precizigita, sed ĝi certe transpasas plurajn milojn entute. El la mondkonataj entreprenoj, kiuj tiucele utiligis aŭ plu utiligas la Internacian Lingvon, estu nur menciitaj la flugkompanioj KLM, SAS, BEA, BOAC, SABENA, TWA, LOT, Swissair, Air France, Iberia; la filmfabrikoj Gevaert (nun Agfa-Gevaert) kaj Kodak; la granda aŭtomobilfabriko Fiat (pluraj riĉe ilustritaj prospektoj kaj kelkaj koloraj sonfilmoj); la multflanka potenca Philips (katalogoj, broŝuro „Modernaj Tendencoj", plurjara daŭra reklamado en Esperanto-periodaĵoj), kiel ankaŭ tuta aro da aliaj, malpli konataj, inter kiuj Whitcombe & Tombs en Novzelando, Ytong en Svedio, Nederlanda Laktaĵoficejo, Companhia Brasileira de Investimentos, Aŭtopramŝipo Danio-Norvegio, Larvik-Friedrikshavn-Ferien, Kemia Fabriko Bruno Vogelmann, Schildknecht Teknikaj kaj Sciencaj Mezurinstrumentoj en Svislando, Unua Aŭstria Ŝparkaso, Glass Export en Ĉeĥoslovakio, Germanaj Fervojoj, Norvegaj Fervojoj, Plumrose Ltd. en Danlando, ktp. Centoj da komercaj reklamoj daŭre aperas ĉie tra la mondo en diversaj Esperanto-periodaĵoj.

En la postmilita periodo kelkaj industriaj-komercaj *foiroj* reestablis siajn antaŭmilitajn tradiciojn rilate la uzon de Esperanto, dum aliaj aldoniĝis. La unua grava utiligo okazis en 1951, kiam en la Festo de Britio (Londono) oficis nombro da interpretistoj ankaŭ por Esperanto. La plej konataj aliaj foiroj utiligantaj la Internacian Lingvon estas tiuj de Padova, Verona, Lyon, Marseille, Bologna, Paris, Barcelona, Poznań, Budapest, Brno kaj Liberec.

Ne estas eble ekscii precize la nombron de industriaj entreprenoj kaj komercaj firmoj, kiuj nuntempe utiligas la lingvon por *internacia komerca korespondado.* Ĉie tra la mondo troviĝas delegitoj de UEA, interalie por la fako komerco. La delegitoj daŭre havigas diversajn komercajn informojn kaj plenumas komercajn servojn.

En 1959 aperis la broŝuro de M. Rétot *Esperanto Parolata* kun adresoj de entreprenoj, kiuj uzas Esperanton. Malgranda aldono estis publikigita en 1961. La broŝuro entenas adresojn de diversspecaj komercaj entreprenoj en 20 landoj.

En 1958 estis fondita Centro por Esperanto en Komerco, Industrio kaj Turismo (CEKIT) en Milano. En 1960 CEKIT eldonis 38-paĝan broŝuron *Adresaro de Firmoj Kiuj Uzas Esperanton en la Internaciaj Rilatoj.* La broŝuro, tre bone sistemigita, konsistas el adresoj de firmoj en 70 fakoj, kiuj uzas Esperanton por internacia korespondado en 29 landoj.

En 1962, en la Dua Parto de la *Jarlibro* de UEA por tiu jaro, estis publikigita ampleksa *Adresaro de Firmaoj kaj Entreprenoj,* en kiuj oficas personoj parolantaj la Internacian Lingvon. La listo, ellaborita de la kunlaboranto de CED D-ro J. Tensen, enhavas sur 62 dense presitaj paĝoj la adresojn de firmoj kaj entreprenoj, al kiuj oni povas sin turni en Esperanto. La listo rilatas al diversspecaj industriaj kaj komercaj entreprenoj en 43 landoj. En la libro *Esperanto en Komerco*, kompilita de Bruno Vogelmann kaj eldonita, same tiel, en 1962, la kompilinto taksas la nombron de entreprenoj uzantaj Esperanton je 5.000. En la libro troviĝas eltiraĵoj el raportoj kaj leteroj, kiujn la kompilinto ricevis de diversaj entreprenoj rilate la praktikajn servojn, kiujn donas la uzo de Esperanto en internaciaj komercaj rilatoj. El ĉiuj raportoj sekvas, ke Esperanto estas tre klara lingvo, taŭge uzebla kaj uzata en komerco. Eraroj kaj miskomprenoj ne okazas.

En Nederlando estis fondita en 1963 Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI) kun la celo disvastigi la uzon de la Internacia Lingvo en internaciaj ekonomiaj rilatoj. Kvankam la laboro de CEKIT kaj ĝia adresaro de 1960, la verko *Esperanto en Komerco* de Vogelmann kaj la tre grava *Adresaro* de Tensen prezentis solidan bazon por grandskala evoluigo de EKI, tamen ĝi ankoraŭ ne plenumis la rolon, por kiu ĝi estis establita. La publikigo de la moderna naŭlingva Komerca-Ekonomia Vortaro, redaktita de F. Munniksma (Nederlando), publikigita komence de 1974, certe donos gravan helpon al ĉiuj uzantoj de Esperanto por komercaj celoj. Pliaj detaloj pri EKI troviĝas en Ĉap. 20.6.

12.5 MONDAJ EKSPOZICIOJ

Mondaj Ekspozicioj en la strikta senco konforme al la internacia interkonsento farita en 1929, ĝis nun estis nur tiuj de Parizo en 1931, Ĉikago en 1933-34, Bruselo en 1935, Parizo en 1937, Novjorko en 1964-65, Montrealo en 1967 kaj Oosaka en 1970. Sed la tradicion,

sur kiu baziĝas la interkonsento de 1929, konsistigas jam la pli fruaj ekspozicioj en Philadelphia en 1926, Wembley en 1924-25, San Francisko en 1915, Bruselo en 1910, Londono en 1908, Lieĝo en 1905, St. Louis en 1904, Buffalo kaj Glasgovo en 1901, Parizo en 1900, ktp.

En pluraj el la menciitaj ekspozicioj la Internacia Lingvo estis diversmaniere uzata:

Parizo (1900): En la Palaco de Eduko kaj Instruo la Esperanto-societo „Espero" de S. Peterburgo okupis apartan ĉambron en la rusa parto de la ekspozicio.

St. Louis (1904): La franca sekcio de Sociala Ekonomio, Grupo 138 (ĝenerala progresado de la sociala movado) inkluzivis ekspozicion de Esperantaj libroj, broŝuroj kaj periodaĵoj.

Bruselo (1910): En la sekcio de Belgio la stando de Centra Oficejo de Internaciaj Asocioj havis ekspozicion pri Esperanto, dum la stando de Internacia Instituto de Bibliografio havis informejon pri la lingvo.

San Francisko (1915): La direkcio de la ekspozicio eldonis broŝuron *La Ekspozicia Fakt-Libro* (30-p.), deklaris la 28-an de aŭgusto *„Esperanto Day"* (Esperanto-Tago) kaj eldonis la oficialan serion de ekspoziciaj poŝtkartoj kun Esperanta teksto.

Wembley (1924-25): La inaŭguran paroladon de la Reĝo (Georgo la Kvina) oni elsendis per radio en Esperanto. Aŭskultintoj el 14 landoj reagis per korespondaĵoj.

Philadelphia (1926): En la kadro de la ekspozicio okazis Esperanto-kunveno aranĝita en kunlaboro kun la ekspoziciaj aŭtoritatoj.

Bruselo (1935): La direkcio de la ekspozicio eldonis ilustritan prospekton en Esperanto.

Novjorko (1939-40): La ekspoziciaj aŭtoritatoj oficiale deklaris la 3-an de julio *„Esperanto Day"* (Esperanto-Tago).

Bruselo (1958): Kvardek personoj ricevis oficialan ateston pri kapablo funkcii kiel libervolaj interpretistoj por Esperanto; ili portis oficialan insignon de la ekspozicio kaj faris multajn servojn.

Novjorko (1964-65): Okaze de la ekspozicio, *New York Convention & Visitors Bureau, Inc.* (Novjorka Buroo por Kongresoj kaj Vizitantoj), financita de la Departemento de Komerco kaj Industria Disvolviĝo de la Urbo Novjorko, eldonis en Esperanto faldfolion *Gvidilo kaj Mapo por Vizitantoj al New York* kun informoj pri la ekspozicio.

Montrealo (1967): La direkcio de la ekspozicio aperigis tutpaĝan reklamon en la revuo *Esperanto,* en tiu jaro abonata en 83 landoj.

12.6 TURISMO

12.6.1 Enkonduka Rimarko

En 1900 la franca *Touring Club* donis fortan apogon al la Internacia Lingvo. En ĝia organo aperis pluraj artikoloj pri Esperanto, kaj tio sendube multe kontribuis al la disvastiĝo de la lingvo inter la membroj de tiu organizaĵo. La apogo estis des pli grava, ĉar ĝi venis en la tempo, kiam ankoraŭ povis ekzisti duboj ĉu la lingvo-projekto de Zamenhof jam tiom evoluis, ke ĝi povos funkcii en la praktiko. En tiu tempo Esperanto estis ankoraŭ tute juna, ne elprovita kiel parola lingvo dum kiu ajn iom grava internacia renkontiĝo. Post la Unua UK de Esperanto en 1905, la lingvo firmiĝis kaj ĉiam pli disvastiĝis tra la mondo. Ekde tiam daŭre vastiĝadis ĝia utiligo por turismaj celoj.

12.6.2 Faldfolioj kaj Prospektoj

La uzo de Esperanto en turismo instigis la turismajn instancojn de multaj urboj kaj landoj eldoni prospektojn kaj gvidlibrojn en Esperanto. Ĝis 1935 entute aperis ĉ. 400 tiaspecaj publikaĵoj; inter 1935 kaj 1945 estis publikigitaj ĉ. 200 pliaj. Ekde 1945 ĝis 1959 estis publikigitaj ankoraŭ 300 turismaj prospektoj kaj broŝuroj, tiel ke entute ĝis la fino de 1959 aperis ĉ. 900. Laŭ la statistiko farita de CED en 1972, ekde la fino de 1959 aperis entute 186 pliaj prospektoj, faldfolioj kaj broŝuroj pri diversaj urboj, regionoj kaj landoj. Tio altigas la suman nombron al ĉ. 1.100 ĝis la fino de 1971. Tre verŝajne estis publikigitaj ankaŭ aliaj, kiujn CED ne registris, tiel ke la menciita nombro devas esti rigardata kiel minimuma.

Jen kelkaj el la urboj, regionoj kaj landoj, kiuj publikigis faldfoliojn aŭ prospektojn inter 1960 kaj la fino de 1971:

Aŭstrio, Supra Aŭstrio, Graz, Linz, Salzburg, Wien; Danlando, Danlando en Bildoj, Kopenhago; Germanio (Ilustrita broŝuro), Hamburg, Bingen, Bonn, Karlsruhe, Insulo Sylt, Saarbrücken, Wiesbaden, Westerland, Aachen, München-Willer, Hannover, Stuttgart, Homburg, Lindau, Düsseldorf; Sofia, Varna, Rila-Montaro, Monaĥejo Ivan Rilski, Bulgara Suna Marbordo; Faktoj pri Nederlando, Arnhem, Rotterdam, Delta-Plano; Faktoj pri Svedujo, Malmö, Landkarto pri Svedio, Höör, Jönköping, Skövde, Lund; Milano, Como, Ravenna, Marina di Massa, Sicilio, Varese, Cremona, Montecatini, La Valo de Aosta; Varsovio, Krakovo, Zakopane, Tieskowa Skała; Miskolc, Szeged; Bruselo, Gent; Lugano, Svisaj Fervojoj, Rouen, Nancy, Vienne, Vichy, Grésillon, Arles; La Britaj Insuloj, Oslo, Norvegaj Fervojoj; Valencia, Valladolid; Mallonge pri Ĉeĥo-

slovakio, Roznov, Liptov; Amika Finnlando, Helsinki, Turku; Niŝ, Niŝka Banja, Bela Palanka, Primoŝten; Ekkonu Israelon, San Diego (Kalifornio).

Multaj el tiuj publikaĵoj estas kolore ilustritaj, kaj ĉiuj havas utilajn informojn por turistoj. Ili estas eldonitaj de urbaj, regionaj aŭ landaj turismaj instancoj.

12.6.3 Gvidlibroj

Aperis ankaŭ pluraj gvidlibroj, pli ol 24-paĝaj. Pluraj estas tre ampleksaj kaj enhavas mapojn, ilustraĵojn, detalajn indikojn kaj informojn pri la muzeoj, artaj galerioj, monumentoj, ktp. El la gvidlibroj, publikigitaj en la periodo inter la du grandaj militoj, aparte menciindaj estas la eldonaĵoj de la itala *Touring Club* pri *Milano kaj la Lagoj de Lombardio* kaj pri *Romo;* la libro *Ĉeĥoslovakio; Gvidlibreto por Japanlando,* eldonita de la Ministrejo de Ŝtat-Fervojoj (1927); *Aŭstralio — Lando kaj Popolo* (1927).

Jen kelkaj pliaj, publikigitaj en la postmilita periodo. La jaro de eldono estas menciita en parentezoj.

La Kunprinclando Andoro, 73 p. (1962); *Bulgario,* 282 p. (1959); *Bulgario — Mallonga Skizo,* 118 p. (1968); *Juĝu Mem! Faktoj pri Ĉeĥoslovakio,* 110 p. (1961), *Praha Gvidlibro,* 186 p. (1961); *Pejzaĝoj de Ĉinio,* 50 p. (1962), *Konciza Geografio de Ĉinio,* 240 p. (1964); *La Dolĉa Franclando* de P. Delaire, 124 p. (1972), *Gvidlibro tra Paris* de Julieta, 249 p. (1965); *Faktoj pri Germanujo,* 94 p. (3-a eld. 1966); *Germana Demokratia Respubliko — Bildoj kaj Faktoj,* 256 p. (1969); *Utila Manlibro pri Hindujo* de M. Haudebine, 76 p. (1967); *Hispanio por Vi,* 71 p. (1965); *Hungario sur Bildoj,* 147 p. (1965); *Faktoj pri Islando,* 72 p. (1961); *Faktoj pri Israelo,* 24 p.; *Japanujo Hieraŭ kaj Hodiaŭ,* 35 p. (1965); *Jugoslavio kaj Ĝiaj Popoloj,* 312 p. (1953); *Nederlando,* 104 p.; *Pollando 1944-1964,* 259 p. (1964); *Resumo pri Vjetnamio,* 128 p. (1971).

12.6.4 Periodaĵoj

Menciindaj estas la sekvantaj periodaĵoj el la postmilita periodo:

Esperanto-Turismo aperis en 1967 okaze de la Jaro de la Monda Turismo. Ĝi estis eldonata en Belgio. *Turista Mondo,* kvaronjara, riĉe ilustrita, ekaperis en Zürich en 1969, sub la redakto de D-ro H. J. Unger, en 10.000 ekzempleroj, sed ĉesis aperadi en 1972. *Ripozoj,* dumonata, riĉe ilustrita, estis eldonata en Bulgario de 1964 ĝis 1970. Ekde 1972 aperas en la sama lando *Bulgario — Turisma Informo.* En 1973 komencis aperadi en Bulgario *Turismo per Esperanto,* bulteno de Asocio Monda Turismo, ankoraŭ ne plene formiĝinta.

12.6.5 Perspektivoj por la Estonteco

Estas tute klare, ke turismo estas vasta kampo por amasa utiligo de la Internacia Lingvo. Plia evoluigo precipe de kultura turismo por la larĝaj popoltavoloj ne estas realigebla sen la helpo de simpla kaj neŭtrala lingvo kiel instrumento de komunikado.

Kultura turismo ricevas ĉiam pli grandan signifon. La Projekto de Mallonga Skiza Plano por 1973 ĝis 1978 de Unesko antaŭvidas vastigon de la agado sur la kampo de internacia vojaĝado de personoj interesitaj pri scienco kaj teknologio, edukado, kulturo kaj informadó. La Plano antaŭvidas, ke en 1975 estos entreprenita aparta studo, en kunlaboro kun internaciaj vojaĝaj organizaĵoj, pri la eduka, scienca kaj kultura efikoj de eksterlandaj vojaĝoj. Kiel organizaĵo en konsultaj rilatoj kun Unesko, UEA prezentos siajn proponojn al la Sekretariato de Unesko rilate la utiligon de la Internacia Lingvo por tiuj celoj.

Intertempe, Universala Esperanto-Asocio jam praktike agas en tiu direkto. Unu membro de la Estraro de la Asocio estas aparte ŝarĝita pri turismo kaj aŭtomobilismo. La jaraj universalaj kongresoj de Esperanto entenas en siaj programoj partojn rilatantajn al kultura turismo. Al tio apartenas la kulturaj festivaloj, organizataj de tempo al tempo (v. Ĉap. 11.5); la regulaj, ĉiujaraj programoj pri artoj kaj folkloro de la kongresa lando; organizitaj vizitoj al kulturaj vidindaĵoj; prelegoj pri kutimoj kaj vivmaniero; ekskursoj kun kultura enhavo. La UK de Esperanto en Portland (1972) dediĉis apartan atenton al turismo: en unu el la ĝeneralaj kunvenoj estis pridiskutita la demando „Monda Turismo kaj Lingva Diverseco". Estis pritraktitaj la historia evoluo kaj la ekonomia aspekto de la nuntempa moderna turismo, unuflanke, kaj la atingoj de la Esperanto-Movado sur la kampo de turismo, aliflanke. La Kongresa Rezolucio resumas la ĉefajn konkludojn.

Ankaŭ aliaj internaciaj konferencoj, seminarioj kaj similaj renkontiĝoj, uzantaj Esperanton kiel oficialan lingvon, regule enhavas en siaj programoj partojn rilatantajn al kultura turismo. En julio, 1972, en Budapeŝto okazis Hungara Kultura Festivalo, en kiu estis prezentitaj diversaj aspektoj de la kultura vivo de tiu lando. Komence de aŭgusto 1973, post la UK en Beograd, okazis en Ateno la Oficiala Postkongreso, por la unua fojo plene dediĉita al kultura turismo.

Fine, necesas mencii la rolon de la Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista, kiu internacie kunligas ĉiujn aŭtomobilistojn sciantajn la lingvon. La Klubo prezentas servojn al sia membraro kaj, pere de la membraro, al aliaj aŭtomobilistoj dum iliaj vojaĝoj.

Internacia turismo estas nuntempe unu el la plej vastaj kampoj, sur kiuj la scio de la Internacia Lingvo donas multnombrajn prak-

tikajn servojn. Turismo estas ankaŭ la sfero, kiu, pro la evolutendencoj de la lastaj jaroj, prezentas plej multe da eblecoj por plua, multe pli amasa praktika utiligo de Esperanto.

12.7 POŜTO-TELEGRAFO-TELEFONO (PTT)

12.7.1 Ĉefaj Historiaj Datoj

Iom post iom la Internacia Lingvo penetris ankaŭ en la medion de poŝto, telegrafo kaj telefono. Jam tre frue, en 1892-93, en Ruslando oni sendadis telegramojn en Esperanto sen malhelpo. La 30-an de decembro 1904 la poŝta administracio donis oficialan permeson sendi telegramojn en tiu lingvo, sub la kondiĉo, ke samtempe estu prezentita ankaŭ traduko en la nacia lingvo.

La 30-an de novembro 1906 la gazeto *Boletim Telegráfico* de Brazilo entenis dekreton, laŭ kiu Esperanto estis akceptita kiel klara lingvo por telegramoj en la enlanda servo.

En 1913 la poŝta administracio de Nederlando permesis, ke oficistoj de PTT, parolantaj la Internacian Lingvon, surportu dum sia deĵorado la Esperantan insignon kiel indikon, ke ili parolas la lingvon. En la sama jaro oni povis vidi en Belgio, en la poŝtoficejo de Charleroi, ŝildeton kun la indiko „Oni Parolas Esperanton". Verŝajne ĝi estis la unua tiaspeca ŝildo en poŝtoficejoj.

Post la Unua Mondmilito — en la epoko, kiam Soveta Unio ankoraŭ rilatis favore al Esperanto — aperis diversspecaj poŝtkartoj kaj kovertoj en kelkmilionaj eldonoj kun surskriboj en la nacia lingvo kaj en Esperanto: „Poŝta Karto", „Por Respondo", „Poŝto", „Fermita Letero" ktp. Eĉ pli, en la jaro 1925 USSR eldonis la unuan poŝtmarkon kun teksto en Esperanto. La sekvintajn jarojn aperis pluaj poŝtmarkoj kun teksto en la Internacia Lingvo. En 1930 estis publikigita en USSR la lasta oficiala eldono de poŝtmarkoj kun teksto en Esperanto. Post la Dua Mondmilito Bulgario, Brazilo, Aŭstrio kaj aliaj landoj eldonis poŝtmarkojn kun Esperanto-teksto, pri kio iom pli en la sekvanta sekcio de tiu ĉi subĉapitro.

En ligo kun la diskutoj pri la Internacia Lingvo en la kadro de la Ligo de Nacioj, nombro da delegacioj proponis en 1924 rezolucion, laŭ kiu Esperanto estis rekomendita kiel „klara lingvo" en la telegrafado. La rezolucio estis ĉiuvoĉe akceptita la 20-an de septembro 1924, kaj ĝi, do, estas la unua oficiala rekono de Esperanto, kiel funkcianta lingvo. En 1925 Universala Telegrafa Unio (Union Télégraphique Internationale), en sia tutmonda konferenco en Parizo, realigis la rekomendon de la Ligo de Nacioj kaj ŝanĝis sian regularon, tiel ke Esperanto estis allasita kiel „klara lingvo" en telegrafado. En tiu senco

Esperanto estis oficiale rekonita ankaŭ de Universala Telegrafa Unio, kaj tiun pozicion ĝi konservis ĝis la hodiaŭa tago. V. ankaŭ 22.2.6.

En Nederlando, en ĉiuj telefonĉeloj nun troviĝas instrukcioj ankaŭ en Esperanto. Nenio malhelpas, ke ankaŭ en aliaj landoj, precipe en tiuj de granda turismo, oni imitu tiun utilan ekzemplon.

Esperanto estas relative bone disvastigita inter la oficistaro de PTT en diversaj landoj. Jam en 1911 estis fondita Internacia Ligo de PTT-Esperantistoj, kiu ĉiam pli disvastigis sian agadon ĝis la Dua Mondmilito. Post la Dua Mondmilito tiu organizaĵo denove ekfunkciis sub la nomo Internacia Ligo por Esperanto en Poŝtoj, Telekomunikoj kaj Transportoj (ILEPTT). La aktivigo de tiu organizaĵo povus doni fortan antaŭenpuŝon al la praktika utiligo de Esperanto en la poŝtaj, telegrafaj kaj telefonaj servoj.

12.7.2 Poŝtmarkoj kaj Poŝtaj Stampoj

En pluraj okazoj la poŝtaj aŭtoritatoj de diversaj landoj eldonis poŝtmarkojn kun teksto en la Internacia Lingvo aŭ kun la mencio de la vorto Esperanto. En aliaj kazoj estis uzataj poŝtaj stampoj kun teksto en la Internacia Lingvo.

Kompleta listo de poŝtmarkoj kun Esperanta teksto aperis en 1969 kiel dokumento de CED H/V/3. El la resuma statistiko vidiĝas, ke entute 10 landoj en diversaj okazoj eldonis poŝtmarkojn kun Esperanta teksto: Aŭstrio, Bavario, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Soveta Unio kaj Triesto B. Entute, inter 1911 kaj 1969, estis publikigitaj 53 diversvaloraj poŝtmarkoj. Plej multajn publikigis Soveta Unio: 19; sekvas Brazilo kun 7 eldonoj kaj Hungario kun 6.

La dokumento de CED H/V/4 enhavas la liston de ĉiuj oficialaj poŝtaj stampoj kun teksto en Esperanto. Inter 1912, kiam aperis en Argentino la unua poŝta stampo, kaj la 31-a de decembro 1968, entute 24 landoj havis tiajn stampojn. La nombro de stampoj estas 447. Plej multajn (102) havis Pollando; sekvas Germanio kun 42 kaj Francio kun 33.

Fine necesas mencii la t.n. tutaĵojn. Esperanto-tutaĵoj estas kutime kovertoj aŭ poŝtkartoj rilatantaj al Esperanto, ĉu tiel, ke la teksto sur la poŝtkarto aŭ koverto estas presita en Esperanto, ĉu tiel, ke la enpresita poŝtmarko havas tekston en tiu lingvo. Temas pri oficialaj poŝtaj dokumentoj. Laŭ la dokumento de CED H/V/5, entute 10 landoj eldonis 639 tutaĵojn inter 1926 kaj 1969.

12.8 INTERNACIAJ FAKAJ INTERŜANĜOJ

Aldone al la utiligado de Esperanto por praktikaj fakaj celoj pere de la fakdelegitoj (v. supre en 12.2), grandajn kaj multflankajn avantaĝojn donas la internaciaj fakaj Esperanto-asocioj. Temas pri internaciaj organizaĵoj, kies membraro konsistas el samfakuloj sciantaj la Internacian Lingvon. Tiaj fakaj societoj formiĝis jam en la fruaj jaroj de Esperanto, tuj kiam ekzistis sufiĉe granda nombro da samfakuloj kun kontentiga kono de la lingvo.

Por ĉiu racie pensanta homo estis evidenta la granda praktika utileco de unusola, neŭtrala lingvo por internacia komunikado de samfakuloj, sed estis ankaŭ same klare, ke neniel eblas utiligi la lingvon por fakaj, profesiaj celoj, se en la koncerna fako neniu parolas ĝin. Tial ekde la komenco, la ĝusta formulo estis kaj restas: organizi la samfakulojn, kiuj sub diversaj influoj ellernis la lingvon kaj parolas ĝin; organizite plu disvastigi la lingvon en la koncernaj fakoj kaj, paralele, konscie faciligi ĝian uzon por fakaj celoj; utiligante la vastiĝon de praktikaj aplikoj, samtempe instigadi al lernado aliajn personojn en la samaj fakoj, kio aŭtomate kreas novajn eblecojn por praktika aplikado.

Tiu ideo estas entenata, en tiu aŭ alia formo, en ĉiuj statutoj de la nuntempaj internaciaj fakaj aŭ specialigitaj Esperanto-organizaĵoj. Pere de siaj periodaĵoj, internaciaj konferencoj, rektaj interŝanĝoj de fakaj spertoj, ili donas multajn praktikajn avantaĝojn al la membraro kaj, ne malofte, kun la helpo de la membraro ankaŭ al aliaj personoj.

Koncizaj informoj pri ĉiuj fakaj organizaĵoj, inkluzive la ĉefajn aspektojn de ilia laboro, troviĝas en Ĉap. 16.

12.9 PRAKTIKA HUMANECA LABORO

12.9.1 Unua Mondmilito

Kiam eksplodis la Unua Mondmilito en 1914, miloj da homoj troviĝis en eksterlando ĉu por ferii, ĉu por studi, ĉu kiel laboristoj, oficistoj, entreprenistoj. De unu tago al la alia, tiuj „gastoj" subite fariĝis „malamikoj".

En tiaj kondiĉoj UEA kreis novan servon, kiu post kelka tempo fariĝis tre ampleksa. La iniciato venis de la tiama delegito de UEA en Nürnberg, D-ro Orthal, kiu skribis al la Centra Oficejo en Ĝenevo petante sciigojn pri personoj troviĝantaj tiam en la „malamikaj landoj" kaj ne plu donantaj vivosignojn. Inspirita de tiu ĉi servopeto, la fondinto de UEA, Hector Hodler, venis al la ideo ĝeneraligi la

servadon de UEA al pli vasta publiko. Tuj estis preparita cirkulero, kiu estis sendita al ĉiuj delegitoj de UEA tra la tuta mondo. La delegitoj tradukis la tekston kaj ĝi aperis en centoj da gazetoj en la plej diversaj naciaj lingvoj. Jen la kompleta teksto de tiu unika dokumento:

> Ĉar la militagoj okazis preskaŭ subite, multaj personoj troviĝis surprizitaj en la malamikaj landoj kaj ne plu havas la eblon korespondi kun siaj parencoj kaj amikoj. Por laŭeble helpi ilin, la Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, sidanta en Ĝenevo, jus informis siajn delegitojn en la militantaj landoj, ke ĝi volonte servos kiel perilo por la interŝanĝado de privataj korespondaĵoj inter la malamikaj landoj. La leteroj estas ricevataj ĉe la Ĝeneva Oficejo, de kie ili estas transdonataj al la adresato, se bezone post traduko. Estas akceptataj nur la nefermitaj korespondaĵoj havantaj absolute nenian politikan aŭ militan karakteron. La personoj, kiuj deziras uzi tiun ĉi servon, nun en plena funkciado, estas petataj sendi ĉiujn leterojn kun du internaciaj respondkuponoj al Universala Esperanto-Asocio, 10, Rue de la Bourse, Genève.

La rezulto de tiu ĉi mallonga teksto estis preskaŭ timiga. En la komenco venadis 10-15 petoj tage. Poste tiu nombro kreskis al kvindeko, al cento da petoj, ĝis, fine, ĝi estis meze 400 informpetoj en la tago. Oni devas ĉi tie rimarkigi, ke la Internacia Ruĝa Kruco okupis sin nur pri soldatoj, poste ankaŭ pri ekzilitoj, sed lasis la prizorgon de civiluloj plene al UEA.

Necesis sin adapti al la nova situacio. La CO organizis la laboron, kiun helpis deko da personoj libervole: la tuta materialo estis dividita en 8 fakoj: perado de korespondaĵoj, serĉado de personoj, sendado de objektoj, civiluloj en koncentrejoj, rehejmigo de junuloj kaj infanoj, militkaptitoj kaj rilatoj kun la koncernaj armeaj estraroj, rilatoj kun la Ruĝa Kruco, diversaĵoj.

La plej ampleksa estis la fako „perado de korespondaĵoj". Estis necese starigi sliparojn kun la nomoj de la sendintoj kaj de la adresitoj, kun ĉiuj necesaj indikoj, por ke ĉio funkciu glate. Oni serĉadis kaj trovadis ĉiam novajn vojojn por ĉiurilate helpi al la petintoj. Nur kiel ekzemplo estu citita la kazo de la ĉefdelegito de UEA en Moskvo. Kiam la rusa armeo okupis Galicion, la rilatoj inter la okupita parto kaj la neokupita estis tranĉitaj. Tuj alvenis al Ĝenevo miloj da korespondaĵoj, por ke ili estu plusenditaj al la personoj en la okupita parto de Galicio. La CO en Ĝenevo ĉiutage sendis la korespondaĵojn en unu pakaĵo al la ĉefdelegito de UEA en Moskvo. Ĉar la adreso de la ricevonto estis skribita sur la letero mem, la ĉefdelegito en Moskvo enkovertigis ĉiun unuopan leteron, skribis la adreson kaj sendis ĝin al la adresito aŭ pere de la Rusa

Armea Poŝto, aŭ laŭ la kutima vojo, depende de la momenta situacio. En la sama maniero oni sendadis leterojn el la okupita parto de Galicio al la neokupita.

Multaj delegitoj faris grandegajn servojn, kiuj postulis sindonon kaj multan tempon. Aparte menciindaj estas la delegitoj de UEA en Bordeaux, Dresdeno, Rennes kaj Berlino.

Pere de tiu servo miloj da personoj povis korespondi kun siaj parencoj, aliaj miloj retrovis siajn proksimulojn, kaj pliaj miloj estis helpataj per nutraĵoj, vestaĵoj kaj medikamentoj.

La nombro de servoj, plenumitaj tiamaniere de UEA, estis pli ol 100.000 en unu jaro. Tiu grandega laboro povis esti kontentige plenumita dank' al la perfekta funkciado de la delegita reto, dank' al la spirito de humaneco, kiu inspiras la Asocion, dank' al sinoferemo de centoj da delegitoj kaj aliaj libervolaj helpantoj, kiuj faris tiun tutan laboron absolute senpage, pro pura idealismo kaj amo al la Homo.

12.9.2 Dua Mondmilito

Dum la Dua Mondmilito UEA starigis similan servon, sed en multe malpli granda skalo. La malpermeso de Esperanto kaj de Esperanto-organizaĵoj en Germanio kaj en la landoj sub la nazia jugo senigis la Asocion de kunlaborantoj ĝuste en landoj, kie koncentriĝis plej multe da mizero kaj samtempe da espero. Krome, la dueco de la tiama neŭtrala Esperanto-Movado ankaŭ malhelpis pli efikan laboron.

Jam en 1936 estis kreita servo sub la nomo „Esperantista Interhelpo". Ĝia celo estis helpi al la viktimoj de la nazia teroro, precipe al judaj esperantistoj el Germanio, Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio, Pollando kaj aliaj landoj, kiuj iom post iom estis okupitaj de la naziaj trupoj. La servo helpis al multaj viktimoj, devigitaj forlasi siajn hejmojn, retrovi trankvilon en liberaj landoj.

Dum la milito mem la servo peradis sendon ne nur de korespondaĵoj, sed ankaŭ de nutraĵoj al internigitaj personoj. Tio okazis laŭ sistemo aprobita de la Svisa Registaro. La servo ankaŭ ebligis transsendon de mono el Usono al viktimoj de la reĝimo en Rumanio. Atentindan helpon donis la servo al internigitoj en Francio: unue al la ekzilitoj el Hispanio kaj poste al la forpelitaj Judoj el Germanio kaj Pollando.

La poŝta kontrolo fare de la nazia reĝimo, la fakta izoligo de Svislando kaj la negativa pozicio de la nazioj rilate la Internacian Lingvon kaj la Esperanto-organizaĵojn, haltigis tiun servon en 1942. Post tio UEA povis nur sporade helpi. Estas menciinde, ke Esperantista Interhelpo havigis seninterrompe vivbezonaĵojn al la membroj de la familio Zamenhof. Unu post la alia ili estis brute mortigitaj

de la nazioj, tiel ke el tiu granda familio post la milito restis vivaj nur kelkaj membroj en Pollando aŭ en la landoj de okcidenta Eŭropo.

Post la finiĝo de la milito IEL/UEA organizis helpon al siaj membroj, iliaj familianoj kaj aliaj personoj en la landoj, kiuj pleje suferis pro la nazia teroro kaj militaj operacioj.

Ampleksa dokumentaro pri tiu ĉi humaneca aktivado de UEA dum la du grandaj mondmilitoj estas konservita en la arkivo de la Asocio.

12.10 ESENCA BIBLIOGRAFIO

Lapenna, I. (red.), *La Internacia Lingvo (Faktoj pri Esperanto)*. Londono 1954.

Ŝirjaev, I. (ĉefred.), *Enciklopedio de Esperanto*, Vol. I-II. Budapest 1933-34 kaj 1934-35.

Dokumentoj de CED, precipe en la Serioj G/V kaj H/II-H/V.

Atentigo: Vidu ankaŭ la noton en la fino de la Tria Parto pri la ĉefaj fontoj por verkado de la Ĉapitroj 11, 12 kaj 13.

ĈAPITRO 13

INSTRUMENTO DE INTERNACIA KOMPRENIĜO

13.1 MEMEFIKO KAJ LAŬCELAJ AGADOJ

Sendube, la lingvaj malfacilaĵoj troviĝas en la radikoj mem de la ideo de komuna supernacia lingvo. Sed tiuj malfacilaĵoj fariĝas objektivaj obstakloj kaj sentiĝas kiel tiaj ĝuste tial, ĉar oni ekkonceptas la homaron kiel principe unuecan kaj la mondon kiel principe tutecan. Zamenhof ne nur komprenis, sed ankaŭ emocie sentis tion, des pli ke li naskiĝis, edukiĝis kaj vivis en medio plurnacia, saturita de reciprokaj intergentaj antagonismoj.

Kiel analizite aliloke [1], en la menso de Zamenhof la ideo mem de komuna internacia lingvo estis nedisigeble ligita al humaneca internaciismo, kiun li nomis, eble ne tute adekvate, „interna ideo". En sia parolado, eldirita dum la UK de Esperanto en Ĝenevo, li emfazis: „Tiu ĉi ideo — vi ĉiuj sentas ĝin tre bone — estas *frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj*. Tiu ĉi ideo akompanadis Esperanton de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo". Aliloke, en la sama parolado, li diris:

> Se mi la tutan pli bonan parton de mia vivo memvole pasigis en grandaj suferoj kaj oferoj kaj ne rezervis por mi eĉ ian rajton de aŭtoreco — ĉu mi faris tion ĉi pro ia praktika utileco? Se la unuaj esperantistoj pacience elmetadis sin ne sole al konstanta mokado, sed eĉ al grandaj oferoj, kaj ekzemple unu malriĉa instruistino longan tempon suferis malsaton, nur por ke ŝi povu ŝpari iom da mono por la propagando de Esperanto — ĉu ili ĉiuj faris tion ĉi pro ia praktika

1. Vidu Ĉap. 2.3, precipe 2.3.3.

utileco? Se ofte personoj alforĝitaj al la lito de morto skribadis al mi, ke Esperanto estas la sola konsolo de ilia finiĝanta vivo, ĉu ili pensis tiam pri ia praktika utileco? Ho, ne, ne, ne! ĉiuj memoris nur pri la interna ideo entenata en la esperantismo; ĉiuj ŝatis Esperanton ne tial, ke ĝi alproksimigas reciproke la *korpojn* de la homoj, eĉ ne tial, ke ĝi alproksimigas la *cerbojn* de la homoj, sed nur tial, ke ĝi alproksimigas iliajn *korojn*.

Ankaŭ tiurilate la subjektiva penso de Zamenhof reflektis la evoluon de la materiaj fortoj en la realo de la monda socio, kaj harmonie akordis kun la objektive formiĝantaj kondiĉoj por ekesto kaj fakta funkciado de la lingvo. Efektive, ĉiu lingvo per si mem efikas kuntene — kaj *tiusence* solidarige — rilate la socian grupon en kiu ĝi formiĝis kaj en kiu ĝi rolas kiel instrumento de komunikado, sed, aliflanke, ĝi samtempe fremdigas la koncernan lingvan komunaĵon disde ĉiuj aliaj. La sola escepto estas la Internacia Lingvo. Pro sia karaktero de lingva komunikilo por monde internacia komunaĵo, Esperanto povas manifesti sole kuntenan aspekton, neniel la disigan. En la Antaŭparolo al la *Unua Libro* Zamenhof skribis:

La diferenco de la lingvoj prezentas la esencon de la diferenco kaj reciproka malamikeco de la nacioj, ĉar tio ĉi antaŭ ĉio falas en la okulojn ĉe renkonto de homoj: la homoj ne komprenas unu la alian kaj tial ili tenas sin fremde unu kontraŭ la alia. Renkontiĝante kun homoj, ni ne demandas, kiajn politikajn konvinkojn ili havas, sur kiu parto de la tera globo ili naskiĝis, kie loĝis iliaj prapatroj antaŭ kelke da miljaroj: sed tiuj ĉi homoj ekparolas, kaj ĉiu sono de ilia parolo memorigas nin, ke ili estas fremdaj por ni.

H. Barbusse, la granda franca verkisto, preskaŭ eĥis la pensojn de Zamenhof skribante en la Antaŭparolo al sia verko *Eklumo en Abismo:*

La parolmodoj intime ligiĝas al pensomodoj. Ni ne plu povas apartigi, en la stato nun atingita de nia kulturo kaj spiritostato nuntempa, la esprimon de la ideo. Jen kial la vere profunda fratiĝo devenos de la komuna uzado de la samaj vortoj; la samaj spiritformoj, la samaj korinklinoj ne sufiĉas.

Restante plene en la kadro de scienca analizo, en tiu senco — *sole en tiu senco* — oni povas paroli pri la spontana, aŭtomata aŭ memefika solidariga funkcio de la Internacia Lingvo. Zamenhof, esence, ne transiris tiujn limojn, kiel ofte neinformitaj personoj klopodas kredigi. En Ĝenevo, en 1906, li precizigis:





La Internacia Lingvo sukcesis venki ankaŭ plurajn nelingvajn obstaklojn, kiuj malhelpas la unuecon de la homaro kaj tutecon de la mondo.



13 INSTRUMENTO DE INTERNACIA KOMPRENIĜO

> Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj: ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunikiĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinaltrudado.

Similan ideon esprimis alia granda franca verkisto, Romain Rolland, kiam li diris: „Por ke la popoloj povu interkonsenti, ili devas antaŭ ĉio kompreni unu la alian"; aŭ, por citi ankoraŭfoje H. Barbusse:

> Necesas, ke la homoj, se ili deziras liberiĝi de siaj jarcentaj ĉenoj, interkompreniĝu. Por ke ili interkompreniĝu, necesas, ke ili parolu la saman lingvon.

Per tio, aldone al memefiko en la prezentitaj limoj, oni atingas plian ŝtupon, jam kun vola elemento, nome utiligon de la lingvo por internacia kompreniĝo. Ankaŭ tiurilate ne estu miskompreno: por personoj alkroĉitaj ekskluzive al siaj naciaj medioj kaj kun horizontoj tiel mallarĝaj, ke ili tutsimple ne volas scii kion ajn pri „fremdaj" popoloj kun la escepto de informoj aŭ nuraj fantaziaj rakontoj, firmigantaj ilin en la erara konvinko pri la supereco de la propra, la scio de la Internacia Lingvo, eĉ se ili hazarde ellernas ĝin, ne havas tre grandan valoron. Aliflanke, jam tre ofte okazis, kaj tutcerte plu okazados, ke eĉ personoj altiritaj al Esperanto pro la pure praktika utileco, kiun prezentas la scio de tiu lingvo, tamen, ĝuste pro ĝia pozitiva memefika influo, kun la tempo lernis pli bone kompreni alinacianojn kaj aprezi alies vivkonceptojn. Kompreneble, tian mensan transformiĝon el regiona aŭ nacia ekskluziveco en mondan vastecon abunde helpis kaj ĉiam pli efike plu apogos la tuta esperantlingva kulturo, necese internacia kaj enhave kaj forme.

Mallonge, se, unuflanke, la Internacia Lingvo certe per si mem ne povas solvi ĉiujn aktualajn problemojn de la internacia komunaĵo — kaj neniam kiu ajn pretendis, ke ĝi povus havi tian miraklan potencon —, aliflanke estas same certe, ke la fortoj celantaj internacian kompreniĝon kaj interpopolan pacon ne povos fari pli atentindajn progresojn sen la helpo de la Internacia Lingvo, nome sen ĝia ĝeneraliĝo.

Por Zamenhof komuna tuthoma lingvo neniam estis celo al si mem, sed unu el la plej gravaj rimedoj por forigi la miskomprenojn, suspektojn kaj malamon inter la popoloj, por krei kondiĉojn de interkompreniĝo kaj reciproka respektado. Jam en 1878, kiam Lazaro Ludoviko estis ankoraŭ lernanto en gimnazio, li kaj liaj junaj divers-

gentaj kolegoj kantis kanton, en kiu post ĉiu strofo estis ripetataj la vortoj „malamikeco de la nacioj, falu, falu, jam estas tempo". Tiuj vortoj troviĝis en la unua projekto, ankoraŭ tute ne ellaborita, kiu post multaj ŝanĝoj kaj plibonigoj fariĝis Esperanto.

La esenco de tiu ideo estas koncize esprimita en unusola simpla frazo, kiun Zamenhof eldiris en sia admirinda parolado en Bulonjo-sur-Maro tiun historian tagon en 1905, kiam la unuan fojon homoj de multaj diversaj nacioj parole interkompreniĝis per komuna supernacia lingvo:

> Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maro kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj.

Tia konceptado de la rolo de Esperanto, tute konforma al ĝia internacia karaktero, kondukis al plia kaj lasta ŝtupo, nome al organizitaj agadoj, kies rektaj aŭ nerektaj celoj estas evoluigi amikajn rilatojn inter la popoloj, kontribui al pli bona internacia kompreniĝo kaj, rezulte, al monda paco. Temas pri planitaj laŭcelaj agadoj, inter kiuj la universalaj kongresoj de Esperanto, diversaj internaciaj konferencoj kaj aliaj renkontiĝoj, tutmondaj kampanjoj por disvastigado de humanecaj ideoj okupas aparte elstaran pozicion.

13.2 UNIVERSALAJ KONGRESOJ

13.2.1 Enkonduka Rimarko

La universalaj kongresoj de Esperanto (UK) estas la plej grandaj kaj plej imponaj manifestacioj de la Esperanto-Movado, unikaj en la tuta mondo ne nur pro la uzo de unusola neŭtrala lingvo, sed ankaŭ pro la konstanta progresigado de porpacaj ideoj kaj evoluigado de humaneca internaciismo. Laŭ la nuna Kongresa Regularo de UEA, la UK „celas fortikigi la solidarecon inter la esperantistoj, progresigi la Movadon kaj studi ĝiajn problemojn". Kvankam la solidariga rolo estas la plej grava aspekto kaj tial menciita sur la unua loko, tamen studado de problemoj, kiujn daŭre frontas la Esperanto-Movado, kaj serĉado de vojoj por plua progresigo de la Internacia Lingvo, estas neniel neglekteblaj. Efektive, sen tiuj ĉiujaraj amasaj renkontiĝoj de la reprezentantoj de multnombraj landaj, regionaj, lokaj, fakaj kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj, kiel ankaŭ de unuopuloj sciantaj la lingvon, apenaŭ estas imagebla kia ajn organizita laboro por la plua progresigo de la Internacia Lingvo. Tial, por bone kompreni kaj ĝuste taksi la signifon de la universalaj kongresoj, necesas preni en konsideron ĉiujn aspektojn, inkluzive la evoluon de la

organizaj formoj, kondukintaj al la nuntempa karaktero de tiuj mondaj manifestacioj de la neŭtrala Esperanto-Movado.

13.2.2 Evoluo de la Organizaj Formoj

La unua internacia renkontiĝo, dum kiu Esperanto estis parolata, okazis en Calais (1904), kiam kunvenis kelkaj francaj kaj anglaj lernintoj de la lingvo. La sukceso estis tiel granda, ke oni decidis organizi internacian kongreson en la sekvinta jaro.


La Unua Kongreso estis organizita de grupo da francaj esperantistoj. La sekretario de la organiza komitato estis Paul Boulet. La kongreso okazis en Boulogne-sur-Mer (Bulonjo-sur-Maro), Francio, en 1905. Partoprenis 688 personoj de diversaj landoj, inter kiuj troviĝis la iniciatinto de Esperanto, D-ro L. L. Zamenhof mem. La kongreso kaŭzis nepriskribeblan entuziasmon inter la kongresanoj kaj veran sensacion en la ekstera mondo. La unuan fojon en la historio de la homaro oni tie parolis unusolan lingvon, komunan al ĉiuj partoprenantoj, vere internacian laŭ sia strukturo, same proksiman al ĉiuj, lingvon, kiu ofendis nenies sentojn.

Dum la Dua Universala Kongreso, okazinta en Ĝenevo en 1906, estis formita Konstanta Komitato de la Kongresoj (KKK), kiu konsistis el Internacia Organiza Komitato (OK), elektita de ĉiu kongreso por prepari la sekvan; el Loka Komitato, kies tasko estis helpi al ĝi por difinitaj lokaj taskoj; kaj Konstanta Ĝenerala Sekretariejo de la Kongresoj, je dispono de la OK.

En la kongreso de Cambridge (1907) estis akceptita la unua Kongresa Regularo (KR). Ĝi difinis la personojn, kiuj rajtas partopreni la kongresojn, la celon de la UK, la temojn priparolatajn, la konsiston de KKK, kaj la estrarojn de la kongresoj.

Dum la 4-a UK en Dresdeno (1908), la KKK estis reorganizita. Ekde tiam la KKK konsistis el du membroj de la OK de la antaŭa kongreso, du membroj de la aktuala, du anoj de la venonta, unu prezidanto kaj unu ĝenerala sekretario, ambaŭ elektitaj de la kongreso mem. La reorganizo evidente celis faciligi la organizajn spertojn de unu kongreso al la alia. Estis ankaŭ aprobita la fondo de Kongresa Kaso, kies celo estis centrigi ĉiujn elspezojn rilate la kongreson, enspezi la kotizojn, donacojn, subvenciojn, ktp. La Loka Komitato povis esti rajtigita de la KKK fari mem difinitajn elspezojn. La profitoj de la antaŭaj kongresoj povis esti, laŭ la decido de la LKK, uzataj por pagi eventualajn deficitojn aŭ konservitaj por helpi venontajn kongresojn.

En 1911, laŭ la propono de Zamenhof, la kongreso en Antverpeno decidis, ke ĉiu persono, kiu pagis la kongresan kotizon kaj sub-



Bulonjo en 1905 (supre) kaj Tokio en 1965 (sube): La universalaj kongresoj ŝanĝis sian fizionomion, sed ilia graveco ne malkreskis.



metiĝas al la Kongresa Regularo, havas la rajton partopreni en la kongreso kaj en la diskutoj, sed voĉdonan rajton havas nur la regule elektitaj delegitoj de Esperanto-societoj. Tiuj rajtigitaj delegitoj estis fakte elektitaj ankaŭ en 1912 kaj 1913.

Laŭ la Kontrakto de Helsinki (1922), la Internacia Centra Komitato (ICK) transprenis la taskon okazigi la UK (v. ankaŭ Ĉap. 14.3.3.). Ĝi tamen komisiis ilian organizon al Konstanta Kongresa Komisiono, kiu konsistis el du reprezentantoj de ICK, du membroj de la Loka Komitato de la estinta kongreso, du de la estonta, kaj du kuratoroj de la Kongresa Kaso. En la Kontrakto estis difinita ankaŭ la konsisto de la kongresa komitato.

Laŭ la Interkonsento de Kolonjo de 1933 (v. ankaŭ Ĉap. 14.3.4), UEA transprenis la taskon organizadi la kongresojn, kaj tiun taskon ĝi plenumas ankaŭ nuntempe.

La Kongresa Regularo estis plurfoje ŝanĝita, ĉiam kun la celo plibonigi la organizon kaj adapti la kongresojn al la postulatoj de la moderna vivo. La unua grava ŝanĝo okazis tuj post la Dua Mondmilito, kiam estis enkondukita la ofico de „kongresoficisto", kiu poste ricevis la titolon Konstanta Kongresa Sekretario (KKS). Tiu oficisto ekfunkciis dum la UK en Bern (1947). Okaze de la kunfandiĝo surbaze de la Kontrakto de 1947 (v. Ĉap. 14.4 kaj 18.1) estis akceptita ne nur la nova Statuto de UEA, sed ankaŭ nova Kongresa Regularo (KR). La bazaj principoj estis fiksitaj en Art. 32-34 de la Statuto, dum la KR reguligis kelkajn detalojn. La laboro kaj respondecoj estis dividitaj inter la Estraro de UEA, kiu aprobis la buĝeton kaj programon, kaj la Loka Kongresa Komitato (LKK), kies tasko estis prizorgi surloke ĉiujn detalojn. La „kongresoficisto" estis nomata de UEA, sed salajrata de la LKK, kiu devis akcepti lin plej malfrue ekde la 1-a de oktobro de la jaro antaŭ la kongreso ĝis la fino de la postkongresa semajno. Li rajtis ĉeesti la kunsidojn de la LKK kaj esprimi sian opinion, sed ne havis voĉdonan rajton. La enkonduko de la funkcio de „kongresoficisto" havis la celon ebligi kontinuecon de la kongresaj spertoj, al kiuj la LKK kontribuis la siajn depende de la landaj kaj lokaj cirkonstancoj.

Dum la UK en Haarlem (1954) estis akceptita tute nova Kongresa Regularo, multe pli detala precipe rilate organizajn demandojn, la prezidantaron de la kongreso, la oficialajn aranĝojn, la rolojn de la Estraro, LKK kaj KKS.

En 1955, okaze de la akcepto de la nova Statuto de UEA (v. precipe Ĉap. 18.3.1), ankaŭ la KR estis reviziita. Grava ŝanĝo rilatis al la t.n. licencpago. Laŭ la antaŭa KR, la LKK devis pagi al la kaso de UEA 15% de ĉiu ricevita kotizo, kaj tiu sumo (licencpago) devis esti apartigita „por la tutmonda propagando kaj precipe por la eldono

de ŝlosiloj, lernolibroj kaj vortaroj en malgrandaj landoj, kie oni ne povas mem eldoni ilin". Laŭ la KR de 1955, la depreno el la kongresaj kotizoj estis altigita al 25%: 15% de ĉiu kotizo plu restis licencpago por la sama celo, dum la ceteraj 10% estis utiligataj por kovri la elspezojn de la KKS, kiu fariĝis salajrata oficisto de UEA, tiel ke la LKK ne plu devis zorgi pri tiu elspezo. La reformo montriĝis utila.

Pliaj amendoj en la KR estis faritaj dum la UK en Kopenhago (1956). Unu el la grandaj ŝanĝoj rilatis al la pozicio de la KKS, kiu plu restis salajrata oficisto de UEA, sed fariĝis ankaŭ laŭofica membro de la LKK. La kontribuo el la kongresaj kotizoj estis altigita al 30%, el kio duono estis la tradicia licencpago, nun utiligata por esploroj, dokumentado kaj monda informado pri la Internacia Lingvo, dum la alia duono estis uzata por kovri la elspezojn de la KKS. La lastaj ŝanĝoj estis enkondukitaj dum la UK en Londono (1971), kiam la Komitato decidis, ke la licencpago de 15% estu malaltigita al 10%, tiel ke nun restas 20% por la ĝenerala kaso, el kiu sumo estas kovrataj la salajro de la KKS, liaj vojaĝoj kaj vivtenaj kostoj en la kongresa urbo, kaj aliaj elspezoj de la Asocio en ligo kun la kongreso.

13.2.3 Nuntempa Strukturo

En la postmilita periodo la universalaj kongresoj tre multe evoluis kaj el vidpunkto de la interna teknika organizo, kaj el tiu de la ekstera prestiĝo, kaj laŭ la kvalito de la programo, kio, cetere, estas reciproke kunligita. La baza ideo, kiu diktas la nunan modernan strukturon, estas ekvilibra kombino de du principoj: la tutmonda karaktero de la kongreso ne nur pro la konsisto de la partoprenantoj, sed ankaŭ laŭ la enhavo, unuflanke, kaj la lokaj-regionaj elementoj, aliflanke. La unua garantias kontinuecon kaj donas al la UK stampon de maksimuma internacieco; la dua aldonas lokajn spertojn kaj koloron.

Laŭ la nun valida Kongresa Regularo (KR), laste reviziita en aŭgusto 1971, UK estas internacia manifestacio de la Esperanto-Movado, organizita de UEA pere de du organoj: la Estraro de la Asocio kaj la Loka Kongresa Komitato. Unu membro de la Estraro estas aparte ŝarĝita pri la kongresoj, se tiun taskon ne plenumas la ĝenerala sekretario de la Asocio. La kunliga elemento estas la Konstanta Kongresa Sekretario (KKS), kiu nun, kiel dirite, estas samtempe oficisto de UEA kaj membro de la LKK.

La Estraro de UEA decidas pri la loko kaj tempo de la UK, surbaze de la ricevitaj invitoj, post interkonsiliĝo kun la koncerna landa asocio (LA). Ordinare okazas unu UK en ĉiu jaro. Nuntempe la kongresoj kutime okazas en la unua semajno de aŭgusto, aŭ fine de

julio kaj komence de aŭgusto. Ili daŭras ok tagojn: de sabato ĝis sabato, kiam finiĝas la kongreso per la ferma kunsido. La inviton kutime faras la loka Esperanto-societo, laŭ ebleco kun la konsento kaj morala apogo de la koncerna LA, aŭ la landa asocio mem. Nuntempe la inviton devas oficiale subteni ŝtata aŭ urba instanco, aŭ grava organizaĵo, ekzemple scienca akademio, universitato, komerca ĉambro, k.s. Al la oficiala invito devas esti aldonita ekzemplero de la Kongresa Regularo, subskribita de la invitanta instanco kiel pruvo, ke ĝi akceptas la principojn kaj regulojn de la KR. La Estraro de UEA devas fari sian decidon almenaŭ unu jaron antaŭ la okazigo, sed lastatempe la elekto de la kongresurbo ofte okazis du aŭ eĉ plurajn jarojn antaŭe, kio donis pli da tempo por bonaj antaŭpreparoj.

La Estraro de la Asocio ankaŭ decidas pri la tagordo de ĉiuj oficialaj aranĝoj dum la kongreso. La ĉefaj oficialaj aranĝoj estas la inaŭguro, la ĝeneralaj kunvenoj kaj sekcioj, la programo de ISU, la oratoraj kaj belartaj konkursoj, la kunsidoj de la Komitato kaj Estraro, nuntempe ankaŭ la publikaj debatoj, la ferma kunsido, kiel ankaŭ aliaj aranĝoj dependa de la cirkonstancoj. La Estraro difinas la specialajn temojn traktotajn dum la oficialaj aranĝoj, kaj tiujn detalojn kiel eble plej baldaŭ post la farita decido komunikas al la LKK. Pli frue tiuj decidoj estis kutime faritaj dum la printempa kunsido de la Estraro, sed nun la plimulton de la decidoj rilate la oficialajn aranĝojn la Estraro faras jam en decembro antaŭ la kongresa jaro. Ankaŭ tio donas pli da tempo por antaŭpreparoj.

Grava rajto de la Estraro estas fiksi la kongresajn kotizojn, ĉiam interkonsente kun la LKK, kaj aprobi la buĝeton.

En la LKK troviĝas la plej elstaraj lokaj esperantistoj, ofte helpataj de personoj el la apudaj urboj. La LKK kutime konsistas el prezidanto, unu aŭ du vicprezidantoj, sekretario, protokolsekretario, kasisto kaj komisiitoj por loĝado, ekskursoj, artaj aranĝoj, junularaj aferoj, infana kongreseto, eksterlanda (Esperanta) informado kaj eventuale aliaj demandoj, dependa de la bezonoj. Samtempe estas elektitaj ankaŭ du revizoroj por kontroli la financojn en la kongresa urbo. Post la kongreso la revizoroj, kune kun la kasisto kaj la KKS, faras la finan financan raporton pri la kongreso. La konsisto de la LKK kaj revizoroj devas esti aprobita de la Estraro de UEA. Necesas aldoni, ke nun la ĉefa administrado de la kongreso estas farata en la CO de UEA, kio liberigis la LKK-on de tiu malfacila kaj respondeca laboro.

La LKK difinas la programon de ĉiuj aliaj aranĝoj kaj kunvenoj, pri kiuj ne respondecas la Estraro. Temas ĉefe pri landaj artaj kaj ĝenerale kulturaj programoj, diversaj ekskursoj dum la kongresa

semajno, postkongresaj vojaĝoj, k.s. Tiun programon la LKK submetas al la Estraro por aprobo.

La KKS estas komisiita ĉefe pri la UK kaj aliaj internaciaj konferencoj, sed la direktoro de la CO povas doni al li ankaŭ aliajn taskojn, se necese kaj se lia tempo permesas tion. Kiel membro de la LKK, li reprezentas tie la direktoron de la CO, kiu siavice respondecas al la Estraro. Kiel menciite supre, pli frue la KKS laboris en la kongresa urbo ekde oktobro ĝis la fino de la postkongresa semajno. Ĉar nuntempe la ĉefa administrado okazas en la CO, la KKS troviĝas en la kongresa urbo dum tiom da tempo, kiom la direktoro de la CO, interkonsente kun la estrarano pri kongresoj kaj interkonsiliĝe kun la prezidanto de la LKK, opinias oportuna. La KKS devas atenti, ke la preparlaboroj disvolviĝu en la kadroj de la Statuto de UEA, de la KR, de la gvidaj principoj de la Asocio kaj de la aprobita buĝeto. La KKS povas eĉ provizore haltigi iun decidon de la LKK, se li rimarkas gravajn deflankiĝojn, sed la fina decido apartenas aŭ al la estrarano pri kongresoj, aŭ al la tuta Estraro, depende de la graveco. La aliaj ĉefaj taskoj de la KKS estas prizorgi kaj redakti la du bultenojn, el kiuj la unua nun aperas pli ol unu jaron antaŭ la tempo de la kongreso; la oficialajn komunikojn por la gazetaro; la kongresan libron; ĉiujn teknikajn detalojn rilate la programon. Dum la kongresa semajno mem la KKS estas la ĉefa respondeculo pri la glata funkciado de ĉiuj aranĝoj kaj teknikaj servoj.

Al UK *rajtas aliĝi* ĉiu persono, kiu scias la Internacian Lingvon, kondiĉe ke li rekonu la Kongresan Regularon, submetiĝu al la leĝoj de la kongresa lando, kaj faru nenion, kio povas malutili al la kongreso. La fakaj organizaĵoj, aliĝintaj al UEA aŭ en kontraktaj rilatoj kun ĝi, havas siajn kunvenojn dum la UK kaj povas prezenti raportojn al la kongreso. Ĉiuj kongresanoj rajtas ĉeesti ĉiujn aranĝojn de la kongreso. Ili rajtas paroli en la ĝeneralaj kunvenoj, kongresaj sekcioj, debatoj kaj aliaj eventualaj laboraj kunvenoj de la tuta kongreso. Se necese, la kongreso voĉdonas pri demandoj submetitaj al ĝi. Tiuj decidoj havas karakteron de dezirespriomoj, kiuj poste estas traktataj de la Komitato de UEA, de la Estraro aŭ de aliaj instancoj, depende de ilia kompetenteco.

La nuna KR difinas klare la *Prezidantaron* de la kongreso. Ĝi konsistas el prezidanto, vicprezidantoj kaj ĝenerala sekretario de UEA; el prezidantoj de la kongresaj sekcioj, rektoro de ISU, prezidanto de la LA invitinta la kongreson kaj prezidanto de la LKK.

La *kongreskotizon* fiksas la Estraro de UEA, sed ĝi tion faras nur post la interkonsiliĝo kun la LKK. Individuaj membroj de la Asocio, gejunuloj en la aĝo de ne pli ol 20 jaroj, gestudentoj, kaj

blindaj personoj ricevas apartajn rabatojn. Ekzistas ankaŭ kelkaj „kasoj" — blindula, literatura kaj adopta — al kiuj oni povas fari donacojn. El tiuj kasoj oni subtenas blindajn partoprenantojn, aldonas premiojn por la gajnintoj de belartaj konkursoj, helpas al kongresanoj el landoj, de kie transsendo de valutoj estas malfacila aŭ malebla. En la komenco de la kongresa laboro la LKK starigas „Garantian Kapitalon" por kovri eventualan deficiton. La Garantia Kapitalo devas esti minimume 5.000 ned. gld. La KR entenas plurajn aliajn detalojn rilate la financan administradon de la UK kaj la respondecojn.

El teknika vidpunkto la nuntempaj universalaj kongresoj de Esperanto povas esti konsideritaj kiel veraj modeloj de bona funkciado. Ĉiuj kongresanoj ricevas jam antaŭ la kongreso la necesajn dokumentojn, inter kiuj la unuan lokon okupas la *Kongresa Libro*. La aliajn dokumentojn ili ricevas tuj post sia alveno. La kongresanoj estas akceptataj ĉe la stacidomoj, flughavenoj kaj aliaj alvenlokoj. Ili ricevas precizajn informojn pri siaj hoteloj aŭ aliaj loĝlokoj. En la kongresejo mem konstante funkcias oficejo kun plej diversaj servoj: poŝta, banka, loĝiga, ekskursa, libroservo k.a. Ekde la pariza kongreso (1950) ĉiu UK havas ankaŭ Gazetaran Servon. Ĝi prizorgas gazetarajn konferencojn kaj intervjuojn, ĉiutage eldonas bultenon en Esperanto kaj en la lingvo de la kongresa lando. La nacilingva bulteno estas sendata al la landa gazetaro kaj radio-stacioj, kiel ankaŭ al diversaj presagentejoj; la Esperanto-versio estas senpage distribuata al ĉiuj raportistoj de Esperanto-gazetoj. Dank' al la bona funkciado de la Kongresa Gazetara Servo (KGS), antaŭ, dum kaj post la kongresa semajno aperas granda nombro da artikoloj, informoj kaj intervjuoj en la gazetaro; abunde raportas ankaŭ la radio-stacioj kaj televido. Ne malofte partoj de la inaŭguro aŭ de diversaj kulturaj spektakloj estis prezentitaj en la televido.

La universalaj kongresoj de Esperanto estas ĉiam pli atentataj de la vasta publiko, de la aŭtoritatoj kaj kulturaj instancoj kiel rimarkinde gravaj eventoj.

13.2.4 Celoj kaj Laboro

En la komenco la universalaj kongresoj havis unuavice manifestacian karakteron, kvankam la labora flanko ne estis neglektata. La fakto, ke personoj apartenantaj al multaj nacioj povis interkompreniĝi dank' al komuna neŭtrala lingvo, kontentigadis la kongresanojn kaj iusence estis per si mem celo de la kongreso. Eĉ hodiaŭ ne malmultaj kredas, erare kompreneble, ke la sola celo de UK estas ne pli ol „pruvi, ke Esperanto funkcias". Poste la universalaj kongresoj fariĝis taŭgaj kadroj, en kiuj estis solvataj ankaŭ internaj problemoj de la

Esperanto-Movado kaj organizaj demandoj de UEA, sed por la granda plimulto de la kongresanoj ili plu restis agrablaj internaciaj renkontiĝoj kun fortaj turismaj nuancoj. Ne estas surprize, ke en tiaj kondiĉoj personaj strangaĵoj de unuopuloj, tiom kompromitaj por la seriozeco de la kongreso kaj ĝenerale por la afero de la Internacia Lingvo, povis manifestiĝi almenaŭ certagrade.

En la postmilita periodo UEA, konscie aldonante novajn erojn al la kongresaj programoj kaj forigante la kadukiĝintajn, iom post iom ŝanĝis la karakteron de la kongresoj kaj sukcesis doni al ili novan multfacetan fizionomion de laboro, kulturo kaj digno. Samtempe ĝi klopodis maksimume aktivigi la partoprenantojn. Tiu transformiĝo pli-malpli aŭtomate eliminis la eblecojn de kiaj ajn ekscesoj fare de senrespondecaj unuopuloj.

Nuntempe la universalaj kongresoj, konservante sian manifestacian funkcion, havas jenajn kvar ĝeneralajn celojn: (i) fortikigi internacian solidarecon inter la uzantoj de la Internacia Lingvo; (ii) studi ĉiujn aspektojn de la lingva problemo en internaciaj rilatoj; (iii) kontribui al pli bona internacia interkompreniĝo per disvastigado de kulturaj valoroj senkonsidere al ilia nacia kaj socia origino; (iv) solvadi internajn organizajn problemojn de la Esperanto-Movado. La programo de ĉiu unuopa UK estas konforma al tiuj ĝeneralaj celoj, sed adaptita al la konkretaj cirkonstancoj kaj bezonoj.

Kvankam la nuntempaj kongresoj formale komenciĝas per la Inaŭgura Kunsido, kutime dimanĉon matene, tamen la ampleksaj programoj postulas, ke kelkaj eroj okazu pli frue. Ekzemple, la Estraro de UEA nun regule kunsidas jam la vendredon antaŭ la kongresa semajno por solvi la lastajn organizajn demandojn kaj por fari eventualajn ŝanĝojn en la programo; la saman tagon kutime okazas gazetara konferenco, kiun nuntempe ĉeestas granda nombro da enlandaj kaj eksterlandaj raportistoj. Jam sabaton kunsidas la Komitato de UEA, ofte dum la tuta tago, por komenci la pritrakton de sia longa tagordo; sabate okazas ankaŭ la t.n. interkona vespero, kiu ebligas al la kongresanoj neformale renkontiĝi, interŝanĝi pensojn kaj ankaŭ iom distriĝi.

La kongreson malfermas la prezidanto, en unu kazo (Vieno, 1970) la alta Protektanto mem de la kongreso, dum la *Inaŭgura Kunsido,* vere impona, solena kaj por multaj eĉ emocia. Se iun kunvenon nepre deziras ĉeesti absolute ĉiu kongresano, ĝi estas la inaŭgura. Konsiderante la nombran grandecon de la kongresoj, precipe de kelkaj, ofte estas vera problemo trovi taŭgan salonegon por komforte lokigi ĉiujn. Aldone al la kongresanaro, la nuntempajn inaŭgurajn solenaĵojn ĉeestas la reprezentantoj, ofte la plej altaj funkciuloj, de la enlandaj ŝtataj, provincaj kaj urbaj aŭtoritatoj; oficialaj reprezentantoj, nun

jam tre multnombraj (ĝis 21), de diversaj ŝtatoj: en la lasta tempo kutime ambasadoroj, kulturaj ataŝeoj, ambasadaj sekretarioj, konsuloj aŭ rektaj senditoj de registaroj [2]; reprezentantoj de internaciaj neregistaraj organizaĵoj; membroj de la kongresa Honora Komitato; ĵurnalistoj kaj radio-televidaj raportistoj.

La kreskanta nombro de oficialaj reprezentantoj de ŝtatoj kaj registaroj ŝuldiĝas parte al la altnivelaj programoj de la kongresoj kaj al la ĝenerala prestiĝaltiĝo de UEA, parte al la fakto, ke la Altaj Protektantoj estas plej ofte ŝtatestroj aŭ ĉefministroj [3].

La tagordo de la Inaŭgura Kunsido konsistas el formala malfermo de la kongreso, bondeziroj de la reprezentantoj de la kongreslandaj aŭtoritatoj kaj de la LKK, alparoloj de la oficialaj ŝtataj reprezentantoj (pli frue en naciaj lingvoj, nuntempe ĉiam pli en Esperanto), unuminutaj salutoj de la komisiitoj de la landaj Esperanto-asocioj reprezentitaj en la kongreso kaj de grupoj sen landa organizaĵo, kiel ankaŭ el 2-3 muzikaj punktoj: antaŭ la komenciĝo kaj inter la ĉefaj grupoj de paroladoj. Ekde la Unua Kongreso (1905) elstara evento

2. En la unuaj postmilitaj jaroj preskaŭ komplete forestis la oficialaj ŝtataj reprezentantoj, sed unuopaj eminentaj kongresanoj estis kelkfoje komisiitaj transdoni la salutojn de siaj respektivaj registaroj aŭ eĉ de unuopaj ministroj; en la lasta jardeko diversaj ŝtatoj kaj registaroj ĉiam pli reprezentis sin per ambasadoroj aŭ altrangaj ambasadaj oficialuloj, aŭ per rektaj senditoj.

3. En la lastaj 20 jaroj la Altaj Protektantoj de la UK estis (parenteze, post ĉiu nomo de Alta Protektanto, troviĝas indiko pri la nombro de ŝtatoj oficiale reprezentitaj en la koncerna UK): en 1953 J. B. Tito, Prezidento de Jugoslavio (8); en 1954 D-ro W. Drees, Ĉefministro de Nederlando (12); en 1955 D-ro L. Einaudi, Prezidento de Italio (16); en 1956 H. C. Hansen, Ĉefministro de Danlando (8); en 1957 René Coty, Prezidento de Francio (13); en 1958 D-ro P. Altmeier, Ĉefministro de Rejnlando-Palatinato (8); en 1959 J. Cyrankiewicz, Ĉefministro de Pollando (10); en 1960 Baudouin, Reĝo de Belgio (8); en 1961 Lordo Boyd-Orr, Nobel-Premiito (9); en 1962 Viggo Kampmann, Ĉefministro de Danlando (11); en 1963 Georgi Trajkov, Unua Vicĉefministro de Bulgario (9); en 1964 Juliana, Reĝino de Nederlando (10); en 1965 Prof. D-ro Shibata yuji, Prezidanto de la Japana Akademio (10); en 1966 Ödön Kisházi, Vicprezidento de Hungario (9); en 1967 Zalman Shazar, Prezidento de Israelo (17), kvankam pro la milito la kongreso ne povis okazi en Tel-Aviv, sed en Rotterdam; en 1968 F. Franco, Ŝtatestro de Hispanio (10); en 1969 D-ro Urho Kekkonen, Prezidento de Finnlando (11); en 1970 D-ro F. Jonas, Prezidento de Aŭstrio, kiu mem malfermis la kongreson per memorinda parolado en la Internacia Lingvo (17); en 1971 Kavaliro Peter Studd, Lordurbestro de Londono (15); en 1972 Tom McCall, Guberniestro de Oregon (7). La prezidento de Jugoslavio estis la Alta Protektanto de la UK en Beograd, okazinta en 1973 (21).

ĉiam estis kaj restas la t.n. festparolado. Iam ĝi estis farata de Zamenhof mem, poste de aliaj eminentaj oratoroj, kutime la plej konataj funkciuloj de la Esperanto-Movado[4]. La fina punkto de la tagordo estas la himno, ludata de orkestro aŭ kantata de la kongresanoj.

La nuntempa UK estas fakte iaspeca kongreso de kongresoj kaj konferencoj, ĉar en ĝia kadro okazas tuta aro da jaraj kunsidoj kaj publikaj kunvenoj de internaciaj fakaj kaj specialigitaj Esperanto-organizaĵoj, la kongreso de blindaj esperantistoj, la infana kongreseto, kelkfoje apartaj konferencoj, ĉio ĉi kunligita en unu granda tuto per nombro da komunaj aranĝoj. La multflankeco de la UK spegulĝas en la programo, kiun oni povus nomi programaro konsistanta el multaj unuopaj programoj, nuntempe inter 100 kaj 130, el kiuj ĉiu unuopa siavice konsistas el pluraj eroj aŭ punktoj de tagordo.

Tiu tuta programa materialo estas dividebla en tri ĉefajn grupojn: labora parto, kulturaj aranĝoj kaj distraĵoj.

13.2.4.1 *Labora Parto.* — La laboro de la tuta kongreso nun efektivigas en la kunvenoj de la pleno, en sekcioj aŭ en apartaj laborkunsidoj, depende de la karaktero de la traktotaj demandoj. Almenaŭ unu kunsido de la pleno, nomata ĝenerala kunveno, pritraktas la jaran Estraran Raporton pri la agado de UEA. Ofte estas du ĝeneralaj kunvenoj, el kiuj la dua kutime pridiskutas iun aktualan demandon en ligo kun la lingva problemo en la mondo (ekzemple dum la UK en Londono en 1971). Unu el la ĝeneralaj kunvenoj aŭdas koncizajn raportojn pri la laboro de la fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj. La kunsidoj de la pleno, unuavice la ferma kunsido, aprobas la decidojn de la sekcioj, se la kongreso laboris en formo de sekcioj, aŭ de apartaj laborkunsidoj. Antaŭ la pleno estas proklamataj la gajnintoj de diversaj konkursoj. La ferma kunsido de la kongreso aŭdas plej esencan resumon de la laboro farita dum la kongreso kaj de la plej gravaj konkludoj. Ĝi ankaŭ decidas pri la kongresa rezolucio.

La sekcioj aŭ specialaj laborkunsidoj estas la veraj laborорganoj. Ili pritraktas diversajn problemojn de internaciaj rilatoj en ligo kun la lingva demando. Dependas de la cirkonstancoj kaj eblecoj, ĉu la kongreso laboros en formo de sekcioj, aŭ en tiu de specialaj labor-

4. Ĉiuj paroladoj de D-ro L. L. Zamenhof troviĝas, interalie, en la *Originala Verkaro* (D-ro J. Dietterle); unu el la paroladoj de E. Privat estas presita en la libro *Retoriko* (de I. Lapenna); kelkaj el la inaŭguraj paroladoj de I. Lapenna troviĝas en lia verko *Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj.*



La solena inaŭguro de la 44-a UK en Varsovio dum la jubilea jaro 1959.

kunsidoj, aŭ nur en la kadro de unu aŭ du ĝeneralaj kunvenoj, aŭ en kombino de la tri formoj. La ĉefa diferenco inter sekcioj kaj aliaj laboraj kunvenoj estas, ke la sekcioj kutime laboras paralele kaj ĉiu el ili povas havi plurajn kunsidojn, dum la ceteraj laboraj kunvenoj neniam okazas samtempe.

Ankaŭ la nombro de sekcioj aŭ specialaj laborkunsidoj ne estas difinita. En la kongresoj de Parizo (1950), Munkeno (1951) kaj Oslo (1952) la kongresa laboro estis dividita en kvar sekcioj: (i) Esperanto kaj la Instruado, (ii) Esperanto en Scienco kaj Tekniko, (iii) Esperanto en Internaciaj Intelektaj Interŝanĝoj. (iv) Esperanto en Internacia Trafiko kaj Komerco; en Bolonjo (1955) estis nur du sekcioj; en Majenco (1958) tute ne estis sekcioj, sed du laborkunsidoj. Kompreneble, ĉiam funkciis ankaŭ unu aŭ du ĝeneralaj kunvenoj.

En 1969 (Helsinki) estis enkondukita la t.n. „debato" kiel plia formo de plenkunsidoj, ĉefe por pritrakti internajn demandojn, pri kiuj ekzistas sufiĉe forta malsameco de opinioj.

La varieco de la traktata temaro vidiĝas el la suba tabelo, en kiu la mallongigoj signifas: s = sekcioj, lk = laborkunsidoj, ĝk = ĝeneralaj kunvenoj, d = debato; en la rubriko „ĉefaj temoj" la originalaj titoloj estas koncizigitaj.

ĈEFTEMOJ DE UK DE 1953 - 1973

Jaro	Urbo	Formo	Ĉefaj Temoj
1953	Zagreb	3 s, ĝk	orig. kaj trad. lit.; radio; disvastigo de sciencaj konoj
1954	Haarlem	1 lk, 2 ĝk	la Internacia Lingvo antaŭ Unesko
1955	Bolonjo	2 s, 1 ĝk	Rezolucio de Unesko (1954); la lingva problemo en Eŭropo
1956	Kopenhago	3 s, 2 ĝk	Esp. en edukado; lingva problemo en int. organizaĵoj; Esp. kaj junularo
1957	Marseille	3 s, 2 ĝk	Esp. en edukado; scienco kaj tekniko; komerco kaj turismo
1958	Majenco	2 lk, 2 ĝk	reciproka aprezado de kulturaj valoroj; la lokaj E-societoj
1959	Varsovio	2 s, 2 ĝk	rolo de la E-Movado en la realigado de la projekto de Unesko Oriento-Okcidento; la funkcio de la lokaj E-grupoj en la E-Movado
1960	Bruselo	2 s, 2 ĝk	E. en lernejoj; kontribuo de E. al projekto Oriento-Okcidento

1961	Harrogate	2 ĝk	atingoj de la E-Movado
1962	Kopenhago	2 ĝk	rolo de la lokaj E-grupoj en la nova Laborplano de UEA
1963	Sofio	2 ĝk	Esp. kaj la nuntempa junularo
1964	Hago	2 ĝk	rezultoj de la junulara jaro (1963)
1965	Tokio	2 s, 2 ĝk	aspektoj de internacia kunlaboro; la lingva problemo en int. ekonomiaj rilatoj
1966	Budapeŝto	2 ĝk	Esperanto en fakoj
1967	Tel-Aviv/ Rotterdam	3 s, ĝk	Esp. en profesioj; lerneja kaj eksterlerneja instruado de E.; E. en turismo
1968	Madrid	2 ĝk	kulturaj rajtoj kaj lingva diskriminacio
1969	Helsinki	2 ĝk, d	taskoj de E-organizaĵoj en la nuna monda lingva situacio; E — ĉu ideologia aŭ praktika instrumento?
1970	Vieno	2 ĝk, d	E. kiel instrumento de internacia konceptado de la mondo; generacia konflikto — ĉu realaĵo aŭ preteksto?
1971	Londono	2 ĝk, d	problemo de lingva komunikado en la mondo; neŭtraleco de UEA
1972	Portland	2 ĝk, d	monda turismo kaj lingva diverseco; valoro de fremdlingva instruado en la lernejoj
1973	Beograd	2 ĝk, d	lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko; Ĉu E. povas sukcesi sen lokaj grupoj?

Al la labora parto de la kongreso apartenas la kunsidoj de la Komitato kaj Estraro de UEA: ĉiu el la du organoj kunsidas 3 ĝis 4 fojojn dum la kongresa semajno. En la kadro de la kongreso dudeko da fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj havas siajn apartajn kunvenojn kun propraj tagordoj. Kelkaj el ili okazigas ankaŭ publikajn kunvenojn, en kiuj partoprenas kongresanoj kaj enlandaj samfakuloj por pritrakti fakajn demandojn de komuna intereso. Kunvenas membroj de la Akademio de Esperanto por studi lingvajn demandojn kaj pritrakti internajn organizajn aferojn. Aparte kunsidas TEJO, la junulara sekcio de UEA. Sporade okazas ankaŭ aliaj kunvenoj, ekzemple de la reprezentantoj de la landaj informaj fakoj; aŭ de la delegitoj de UEA; aŭ kunvenoj por pritrakti regionajn lingvajn problemojn.

13.2.4.2 *Kulturaj Aranĝoj.* — Multnombraj estas la kulturaj eventoj en la nuntempaj UK. Tiu parto de la programo konsistas el pre-

legoj de ISU, belartaj kaj oratoraj konkursoj, teatraj kaj filmaj prezentadoj, koncertoj kaj folkloraj dancoj, kongreslandaj artaj vesperoj, ekspozicioj, variaj vesperoj, de tempo al tempo ankaŭ internaciaj artaj festivaloj. Detaloj pri tiuj eroj troviĝas en aliaj partoj de tiu ĉi verko [5].

13.2.4.3 *Distraj kaj Aliaj Eventoj.* — El la distraj, festaj kaj alispecaj aranĝoj menciindaj estas la interkona vespero, la oficiala bankedo, la internacia balo, aparta junulara dancvespero, vizitoj al la kongresa urbo, k.s. Kutime okazas akcepto de la kongresanoj en la urbodomo, kaj de unuopaj grupoj en diversaj ambasadoj. La postkongresaj ekskursoj apartenas al la kategorio de kultura turismo.

La *Kongresa Libro,* riĉe ilustrita, enhavas multajn utilajn informojn, resumojn de raportoj, detalan programon de ĉiuj aranĝoj, artikolojn pri la kongresa lando, frazaron Esperanto-nacilingvan kaj liston de ĉiuj kongresanoj. Pro la grandeco de la nuntempaj kongresoj kaj la amplekso de la programo, la Kongresa Libro atingas eĉ 200 paĝojn.

Raportoj pri la kongreso aperas en la organo de UEA *Esperanto,* en la bultenoj de la Kongresa Gazetara Servo kaj en aliaj Esperanto-periodaĵoj. Ekde sia fondiĝo CED sekvas la evoluon de la universalaj kongresoj kaj regule publikigas dokumentojn.

13.2.5 Deklaracioj kaj Rezolucioj

Ĉiu universala kongreso faras diversajn decidojn aŭ akceptas rezoluciojn. Du kongresoj — tiu de Bulonjo-sur-Maro (1905) kaj tiu de Munkeno (1951) — faris ankaŭ gravajn deklaraciojn.

13.2.5.1 *Deklaracioj.* — *La Deklaracio* de Bulonjo, akceptita la 7-an de aŭgusto 1905, oficiale difinis en kvin punktoj la esencon kaj celojn de la Esperanto-Movado. En p-to 1 estis dirite, ke „la Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa", kaj ke „ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas". P-to 2 akcentis, ke el ĉiuj provoj nur Esperanto montriĝis „perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj pleje taŭga", kaj ke tial ĉiuj „amikoj de la ideo de lingvo internacia" jam delonge grupiĝis ĉirkaŭ Esperanto „kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo". Aparte signifaj pro sia scienca ĝusteco estas p-toj 3 kaj 4, laŭ kiuj Esperanto estas „nenies proprajo", „havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas

5. Vidu precipe Ĉap. 11.

de neniu aparta homo", sed „en rilato materiala" apartenas al la tuta homaro. Nur la *Fundamento de Esperanto*, „en kiu neniu rajtas fari ŝanĝon", estas „unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj". Laŭ p-to 5, „esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas".

La kompleta teksto de tiu ĉi Deklaracio kaj analizo de la cirkonstancoj, en kiuj ĝi estis akceptita, troviĝas en Ĉap. 14.2.3.

La Bulonja Deklaracio ludis decidan rolon en la interna firmigo de Esperanto kiel lingvo, kaj donis solidan bazon por la plua disvastigado de la Internacia Lingvo tra la mondo. Ĝi estas valida ankaŭ hodiaŭ.

Tamen, p-to 1 de la Bulonja Deklaracio estis iom tro „neŭtrala", ĉar ĝi komplete malatentis la aŭtomatan, memefikan solidarigan rolon, entenatan en la karaktero kaj socia funkcio de la lingvo, kiel prezentite supre en 13.1. Tial ĝi estis kompletigita de la Munkena Deklaracio. Ĝi estas rezulto de esploroj kaj studoj pri la sociaj kaj psikologiaj efikoj, kiujn kaŭzas la uzado de Esperanto en la internacia praktiko.

La *Munkena Deklaracio* tekstas:

> La reprezentantoj de la Esperanto-Movado el 40 landoj, kunvenintaj en la 36-a Universala Kongreso de Esperanto en Munkeno, en aŭgusto 1951, akceptas la jenan Deklaracion:
>
> La celo de la Esperanto-Movado estas plena apliko de la Internacia Lingvo Esperanto en ĉiuj sferoj de la internacia vivo kaj por ĉiuj internaciaj rilatoj. El tia vasta uzado de la Internacia Lingvo logike rezultos:
> (1) altiro de pli larĝaj popoltavoloj al aktiva partopreno en la internacia vivo;
> (2) progresigo de la scienco kaj plimultiĝo de la intelektaj interŝanĝoj en internacia kadro;
> (3) plifirmigo de tuthoma solidareco kaj rapidiĝo de la procezo de unueciĝo de la homaro.

Tiu ĉi Deklaracio estis ĉiuvoĉe akceptita de la pleno de la kongreso.

13.2.5.2 *Rezolucioj.* — El la multnombraj rezolucioj, ĉiuj gravaj el tiu aŭ alia vidpunkto en la konkretaj cirkonstancoj, almenaŭ kelkaj estas aparte menciindaj.

La rezolucio de la Dua Sekcio (Scienco kaj Tekniko), aprobita de la 37-a UK en Oslo (1952), estis direktita al Unesko. Ĝi alvokis tiun organizaĵon, „kies celo estas progresigi la internacian kunlaboradon per edukado, scienco kaj kulturo, kaj kies baza programo plurfoje akcentas la lingvajn malfacilaĵojn, objektive esplori la re-

zultojn, kiuj ĝis nun estis atingitaj sur tiuj kampoj per la uzo de Esperanto, kaj la eblecojn pri plua, multe pli ampleksa utiligo de tiu lingvo por la celoj de Unesko". Tiu Rezolucio estis prezentita al Unesko en ligo kun la Peticio favore al Esperanto [6].

La Rezolucio de la 49-a UK en Hago (1964) estis ligita al la Jaro de Internacia Kunlaboro (JIK) kaj adresita al Unuiĝintaj Nacioj. La 21-an de aŭgusto 1964 la Sekretariato de UN esprimis sian dankon al UEA kaj informis, ke la Rezolucio estos transdonita al la Komitato por la JIK. Tiu ĉi Rezolucio fariĝis la teksto de la Propono al UN, apogita poste de milionaj amasoj [7].

La UK de 1967, kiu pro la milito ne okazis en Tel-Aviv, sed en Rotterdam, akceptis plurajn rezoluciojn, el kiuj Rezolucio 2 rekte rilatis al monda paco. Ĝi tekstas:

> La 52-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Rotterdam de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto, esprimas sian konvinkon, ke la vastigo kaj profundigo de la amikaj rilatoj inter la nacioj kaj popoloj estas unu el la esencaj antaŭkondiĉoj por la monda paco, kaj tial en la intereso de la tuta homaro kaj de ĉiu unuopa nacio. Ĝi altiras la atenton de ĉiuj respondecaj publikaj agantoj kaj de la vastaj popoltavoloj al la Internacia Lingvo Esperanto kiel potenca instrumento por atingo de tiu celo.

Akcentitan humanecan kaj porpacan signifon havas ankaŭ la Rezolucio 1 „Por la Homaj Rajtoj", per kiu la 53-a UK en Madrid (1968) alvokis la Esperanto-organizaĵojn instigi siajn registarojn akcepti ĉiujn konvenciojn rilatantajn al la Homaj Rajtoj kaj ratifi la koncernajn paktojn, por kiuj ili voĉdonis. La Rezolucio aparte atentigis pri la neceso kontraŭbatali, kaj sur internacia nivelo kaj en kadroj de diversaj ŝtatoj, lingvan diskriminacion, kiu „en kelkaj kazoj atingas la formojn de kultura genocido". En la Rezolucio estas esprimita la konvinko, ke „la lingva problemo en la hodiaŭa mondo, inkluzive la traktitan aspekton de tiu problemo, povas esti efike kaj juste solvita nur per adekvata adopto de la Internacia Lingvo (Esperanto)".

La Rezolucio de la UK en Helsinki (1969) rilatas esence al vastigo de Esperanto-instruado en lernejoj, ĉefe en ligo kun la Tria Lerneja Konferenco (v. Ĉap. 4.6.1.2), dum la Rezolucio de la UK en Vieno (1970) koncize analizas la procezon de materia integriĝo de la homaro, malantaŭ kiu postrestis la morala-intelekta. La Viena Rezolucio, donante sian plenan apogon al la Internacia Jaro de Edu-

6. Vidu Ĉap. 22.
7. Vidu poste en Ĉap. 13.4 kaj Ĉap. 22.

kado, samtempe atentigas, „ke necesas urĝe kaj konscie rapidigi la procezon de morala-intelekta integriĝo de la homaro sur pli alta ŝtupo por adapti ĝian subjektivan sintenon al la objektivaj kondiĉoj, nome al la materiaj fortoj, kiujn ĝi kreis, sed kiujn ĝi ankoraŭ ne lernis regi". La Rezolucio emfazas, ke „ĉiuj ajn metodoj aplikataj en edukado al internacia kompreniĝo devas aŭ resti senefikaj aŭ doni nur minimumajn rezultojn, se oni ne venkas la lingvan obstaklon kiel fundamentan baron al interhoma komunikado de la popolaj amasoj".

La Rezolucio de la UK en Londono (1971) notis kun kontento la grandan interesiĝon, kiun ĉie elvokis la ĉeftemo de la kongreso „La Problemo de Lingva Komunikado en la Moderna Mondo", kaj konstatis, ke la diskutoj „ankoraŭfoje" evidentigis la eksterordinaran gravecon de la problemo de interkomunikado per lingvo en internaciaj rilatoj en mondaj kadroj"; ke tiu problemo „postulas urĝan solvon, por kiu, pro la konfliktaj interesoj de la naciaj lingvoj, la neŭtrala Internacia Lingvo prezentiĝas kiel la plej racia solvo". Tiu ĉi Rezolucio estis komunikita al la Sekretariato de UN, al Unesko, al institucioj reprezentitaj en la debato kaj al aliaj interesitaj internaciaj kaj naciaj instancoj.

La Rezolucio de la 57-a UK en Portland (1972) rilatas al monda turismo. La Rezolucio konstatas, ke la lingvaj baroj malhelpas veran konon de vizitataj landoj kaj ties popoloj; proponas adopton de unusola lingvo por turismo kaj vojaĝa sekureco; kaj invitas la registarojn kaj internaciajn turismajn organizajojn kunvoki tutmondan konferencon por pritrakti la lingvan problemon en turismo.

Fine, la Rezolucio de la 58-a UK en Beograd (1973) atentigas, ke Esperanto povas decide kontribui al realigo de la kultura programo priparolita dum la Eŭropa Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro (Helsinki, junio 1973).

13.2.6 Nombro

Ekde 1905 ĝis 1973 inkluzive, entute okazis 58 universalaj kongresoj de Esperanto. La suba tabelo donas precizajn informojn pri la jaro, loko, lando kaj nombro de kongresanoj por ĉiu unuopa UK.

LISTO DE UNIVERSALAJ KONGRESOJ

	Jaro	Kongresloko	Anoj
1.	1905	Boulogne-sur-Mer, Francio	688
2.	1906	Genève, Svislando	1200
3.	1907	Cambridge, Britio	1317
4.	1908	Dresden, Germanio	1500

5.	1909	Barcelona, Hispanio	1500
6.	1910	Washington, Usono	357
7.	1911	Antwerpen, Belgio	1800
8.	1912	Kraków, Pollando	1000
9.	1913	Bern, Svislando	1203
10.	1914	Paris, Francio. Ne okazis pro la militdeklaro. Aliĝis	3739
11.	1915	San Francisco, Usono	163
12.	1920	Den Haag, Nederlando	408
13.	1921	Praha, Ĉeĥoslovakio	2561
14.	1922	Helsinki, Finnlando	850
15.	1923	Nürnberg, Germanio	4963
16.	1924	Wien, Aŭstrio	3400
17.	1925	Genève, Svislando	953
18.	1926	Edinburgh, Skotlando	960
19.	1927	Danzig	905
20.	1928	Antwerpen, Belgio	1494
21.	1929	Budapest, Hungario	1200
22.	1930	Oxford, Britio	1211
23.	1931	Kraków, Pollando	900
24.	1932	Paris, Francio	1650
25.	1933	Köln, Germanio	950
26.	1934	Stockholm, Svedio	2042
27.	1935	Roma, Italio	1442
28.	1936	Wien, Aŭstrio	854
29.	1937	Warszawa, Pollando	1120
30.	1938	London, Britio	1602
31.	1939	Bern, Svislando	765
32.	1947	Bern, Svislando	1370
33.	1948	Malmö, Svedio	1761
34.	1949	Bournemouth, Britio	1534
35.	1950	Paris, Francio	2325
36.	1951	München, F.R.Germanio	2040
37.	1952	Oslo, Norvegio	1614
38.	1953	Zagreb, Jugoslavio	1760
39.	1954	Haarlem, Nederlando	2353
40.	1955	Bologna, Italio	1687
41.	1956	København, Danlando	2200
42.	1957	Marseille, Francio	1468
43.	1958	Mainz, F.R.Germanio	2021
44.	1959	Warszawa, Pollando	3256
45.	1960	Brussel, Belgio	1930
46.	1961	Harrogate, Britio	1646
47.	1962	København, Danlando	1550
48.	1963	Sofio, Bulgario	3472
49.	1964	Den Haag, Nederlando	2512
50.	1965	Tokio, Japanio	1710
51.	1966	Budapest, Hungario	3975
52.	1967	(Tel-Aviv)-Rotterdam, Nederlando	1265

53.	1968	Madrid, Hispanio	1769
54.	1969	Helsinki, Finnlando	1857
55.	1970	Wien, Aŭstrio	1987
56.	1971	London, Britio	2071
57.	1972	Portland, Oregon, Usono	923
58.	1973	Beograd, Jugoslavio	1638


Kiel oni vidas, nur unu UK okazis en azia lando (Tokio en 1965); la alia estis okazonta en Tel-Aviv en 1967, sed bedaŭrinde, pro la militaj operacioj en tiu regiono, en la lasta momento la kongresa urbo estis ŝanĝita, kaj la kongreso okazis en Rotterdam. Tri el la UK okazis en Usono: Washington en 1910, San Francisco en 1915 kaj Portland en 1972. Ĉiuj aliaj kongresoj estis en diversaj urboj de eŭropaj landoj.

La plej malgrandan nombron da kongresanoj havis la UK de San Francisco (163), kio ŝuldiĝas al la fakto, ke ĝi okazis dum la Unua Mondmilito. Laŭ la nombro de aliĝintoj, la plej granda UK en la periodo antaŭ la Unua Mondmilito, estis tiu de Parizo (3.739), sed tiu kongreso, pro la militdeklaro, bedaŭrinde ne povis okazi. La plej granda kongreso inter la du mondmilitoj estis tiu de Nürnberg (4.963) dank' al esceptaj valutaj cirkonstancoj, kiuj en tiu tempo kaŭzis, ke restado en Germanio estis bagatele malmultekosta. En la periodo post la Dua Mondmilito plej multe da kongresanoj havis la UK en Budapeŝto (3.975) en 1966. Laŭnombre sekvas la kongreso en Sofio (3.472) en 1963, tiu de Warszawa (3.256) en 1959 kaj tiu de Haarlem (2.353) en 1954. En la lastaj 10 jaroj la nombro de ĉiuj kongresanoj estis entute 19.707, kio signifas, ke la nuntempajn universalajn kongresojn partoprenas meze ĉ. 2.000 personoj.

La UK de 1974 okazis en Hamburg, FR Germanio.

13.2.7 Signifo

La universalaj kongresoj de Esperanto plifirmigas la senton de amikeco kaj internacia solidareco ne nur inter la partoprenantoj, sed, pere de ili, ankaŭ inter la aliaj sciantoj de la Internacia Lingvo. Per sia tuta karaktero la universalaj kongresoj forte kontribuas al pli bona kompreniĝo inter la popoloj. La kongresanoj, reveninte al siaj hejmoj, faras prelegojn, skribas artikolojn kaj alimaniere diskonigas la diversajn aranĝojn kaj la spiriton de internacieco kaj tuthomeco, kiu inspiras tiun grandan mondan manifestacion. Tial la universalaj kongresoj signas ne nur ĉiam plian ŝtupon en la progresado kaj evoluado de la Internacia Lingvo, sed ili estas samtempe gravaj kontribuaĵoj al la ideo de interpopola amikeco.



13.3 ALIAJ INTERNACIAJ KONGRESOJ, KONFERENCOJ KAJ RENKONTIĜOJ

Krom la universalaj kongresoj de Esperanto, regule okazas ankaŭ aliaj internaciaj kongresoj, konferencoj, seminarioj, kursoj, turismaj aŭ sportaj aranĝoj kaj alispecaj renkontiĝoj, organizataj aŭ de UEA mem, aŭ de asocioj el kiuj ĝi konsistas, aŭ de aliaj Esperanto-organizaĵoj. El tiuj lastaj, precipe grava estas la ĉiujara kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). Ĝis inkluzive 1973 SAT organizis 46 kongresojn, el kiuj la lasta okazis en Toronto (Kanado) en julio 1973.

Ĉi tie necesas antaŭ ĉio mencii la internaciajn kongresojn aŭ kunvenojn de diversaj fakaj organizaĵoj, ekster la kadroj de la universalaj kongresoj. Ekzemple, la kongresoj de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, entute 25 ĝis la fino de 1973, ĉiam okazas aparte en diversaj landoj. Same tiel la kongresoj de KELI kaj IKUE aŭ, en la lasta tempo, kelkfoje la komunaj kongresoj de la kristana kaj katolika internaciaj Esperanto-organizaĵoj. Ankaŭ la junulara sekcio de UEA, TEJO, okazigas, aldone al la junularaj kunvenoj dum la UK, ankaŭ siajn proprajn kongresojn, ĉiujare en alia lando. La 28-a Internacia Junulara Kongreso estis en julio 1972 en Toruń (Pollando), kaj la 29-a okazis en Sarajevo (Jugoslavio) fine de julio 1973.

Diversaj internaciaj seminarioj, kulturaj aranĝoj, kursoj aŭ turismaj renkontiĝoj estas organizataj aŭ ĉiujare aŭ kun intervaloj. Menciindaj estas la ĉiujaraj kursoj kaj kulturaj aranĝoj en la Esperantista Kulturdomo en Grésillon (Francio), kiujn en 1972 partoprenis pli ol 500 personoj el 20 landoj; Internaciaj Feriaj Esperanto-Kursoj en Helsingør (Danlando); Internaciaj Seminarioj de GEJ; la internaciaj renkontiĝoj, kutime kun karaktero de kultura turismo, antaŭ kaj post la universalaj kongresoj. Sporade, kun intervaloj de unu aŭ kelkaj jaroj, okazas multaj aliaj renkontiĝoj, inter kiuj elstaras Sveda Somera Semajno, altnivela kultura aranĝo kun prelegoj, diskutoj kaj studrondoj, ĉiam organizata de Sveda Esperanto-Instituto en kunlaboro kun Sveda Instituto por Kulturaj Interŝanĝoj kun Eksterlando.

En la lastaj jaroj manifestiĝis salutinda tendenco okazigi komunajn internaciajn kongresojn aŭ konferencojn de apudaj landaj Esperanto-organizaĵoj, apartenantaj al pli vastaj regionoj kun difinitaj specifaj komunaj trajtoj aŭ interesoj, ekzemple la eŭropaj konferencoj, la trilandaj renkontiĝoj (Francio-Germanio-Italio, aŭ alia kombino), la t.n. „markolaj kongresoj" de distriktoj situantaj ĉirkaŭ la markolo inter Britio kaj la kontinenta Eŭropo. En 1972 la trilandaj renkontiĝoj kaj markolaj kongresoj kuniĝis en Internacia

Esperanto-Kongreso en Antverpeno, Belgio. Ĝi altiris 462 kongresanojn el 12 landoj. En 1973 la ideo konkretiĝis eĉ pli vaste, ĉar en junio en Luksemburgo okazis Eŭropa Kongreso de Esperanto kiel komuna aranĝo de la belga, franca, germana, itala, luksemburga kaj nederlanda Esperanto-asocioj. La ĉefa celo de la kongreso estis pritrakti la lingvan problemon en Eŭropo, tute speciale en la institucioj de la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo. Ĝi altiris multajn kongresanojn ankaŭ el aliaj eŭropaj landoj.

Fine, ankaŭ la kongresoj de landaj Esperanto-asocioj, kelkfoje eĉ la jaraj kunvenoj de distriktaj aŭ interdistriktaj Esperanto-organizaĵoj, ricevas ĉiam pli internacian karakteron pro la partopreno de eksterlandaj gastoj.

Superflue diri, ke en ĉiuj kategorioj de kunvenoj la sola uzata lingvo estas Esperanto.

Laŭ enketo de CED, en 1972 entute okazis, aldone al la UK en Portland, minimume 93 aliaj kongresoj kaj alispecaj kunvenoj [8]. La plej granda el la turismaj aranĝoj estis Internacia Turisma Festivalo en Szeged (Hungario) de la 24-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto, en kiu partoprenis 1.994 personoj el 14 landoj. La plej grava faka kongreso en 1972 estis tiu de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, okazinta en Lugano (Svislando) de la 6-a ĝis la 12-a de majo: partoprenis 548 kongresanoj el 18 landoj. El la kulturaj aranĝoj (inkluzive kursojn) plej multe da partoprenantoj, entute pli ol 500 el 20 landoj, havis la Esperantista Kulturdomo en Grésillon (Francio). Sekvas, laŭ la nombro de partoprenantoj, la Kultura Festivalo en Budapeŝto kun 433 anoj el 20 landoj; Internacia Esperanto-Kongreso en Antverpeno kun 462 kongresanoj el 12 landoj; la kongreso de SAT en Kuopio kun 430 kongresanoj el 17 landoj; Somera Esperanto-Universitato en Gyula (Hungario) kun 387 partoprenantoj el 12 landoj.

Plej multe da landoj — entute 26 — estis reprezentitaj en la 28-a Internacia Junulara Kongreso. Sekvas la Kultura Festivalo en Budapeŝto kaj la aranĝoj en Grésillon (20 landoj), la fervojista kongreso en Lugano (18 landoj) kaj la kongreso en SAT en Kuopio (17 landoj).

El la landaj kongresoj kun internacia karaktero la plej granda estis la 38-a Bulgara Esperanto-kongreso kun pli ol 1.000 kongresanoj kaj gastoj el 10 landoj.

La kongresoj kaj aliaj kunvenoj kun nete internacia karaktero okazis en 23 landoj: Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, FR Germanio, Grekio,

8. La ciferoj rilate la aranĝojn en 1972 estas aŭ minimumaj aŭ proksimumaj, ĉar pluraj organizintoj de kunvenoj en tiu jaro ankoraŭ ne respondis al la koncerna demandaro de CED.

Hispanio, Hungario, Kanado, Italio, Japanio, Jugoslavio, Nederlando, Novzelando, Pollando, Svedio, Svislando, Usono. La teritoria etendiĝo tutcerte estas konsiderinda, multe pli vasta ol antaŭ dudeko da jaroj.

Laŭ la menciita enketo de CED, ankoraŭ nekompleta, la nombro de partoprenantoj en tiuj kongresoj kaj kunvenoj estis minimume 10.500. Oni povas kalkuli, ke almenaŭ 1.500 pliaj partoprenis en internaciaj aranĝoj, pri kiuj ankoraŭ (en marto 1973) mankas informoj, do ĉ. 12.000. Se oni aldonas la mezan nombron de partoprenantoj en la universalaj kongresoj, t.e. minimume 2.000 (v. supre, en la fino de 13.2.6), oni povas taksi, ke nuntempe ĉiujare inter 12.000 kaj 14.000 personoj diversmaniere aktive partoprenas en la laboroj de ĉiuj internaciaj kunvenoj, en kiuj Esperanto estas ne nur la sola oficiala lingvo, sed ankaŭ la lingvo de komunikado ekster la programoj kaj tagordoj.

Centoj da internaciaj kongresoj kaj konferencoj, en kiuj oni uzas diversajn naciajn lingvojn, ĉiujare okazas ĉie tra la mondo. Ĉiu, kiu partoprenis tiajn kongresojn kaj iom atentis ilian funkciadon, scias tre bone, ke la personaj kontaktoj estas minimumaj, kelkfoje vere nulaj, ĝuste pro la nekono aŭ nesufiĉa kono de la naciaj lingvoj uzataj kiel oficialaj aŭ laboraj. Diference de tiuj kunvenoj, la internaciajn kunvenojn kun Esperanto kiel la sola labora lingvo karakterizas senĝena, glata funkciado kaj tre viglaj personaj kontaktoj, kio necese rezultigas pli bonan interkompreniĝon, internaciecan agordon kaj efikecon.

13.4 POR HOMAJ RAJTOJ KAJ INTERNACIA KUNLABORO

13.4.1 Konstantaj Agadoj

Jam antaŭ ol ekzistis la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, UEA deklaris en sia Statuto, ke la „respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo". Tiu principo inkluzivas la ideon de sendiskriminacia egaleco de ĉiuj homoj en maksimumo de ekonomia prospero, socia progreso kaj libereco [9]. UEA ne limigis sin al nura proklamado de la principo, sed klopodas per ĉiuj disponeblaj rimedoj disvastigi ĉiujn humanecajn ideojn kaj apogi ĉiujn fortojn, kiuj celas influi eduke en la direkto de reciproka respektado de la popoloj kaj mildigo aŭ eĉ forigo de antagonismoj.

9. V. ankaŭ Ĉap. 18.2, precipe 18.2.4.

13.4 POR HOMAJ RAJTOJ KAJ INTERNACIA KUNLABORO

Tial UEA kaj la aliĝintaj organizaĵoj daŭre dediĉas atenton al diskonigo de tiuj agadoj de UN, Unesko, ILO kaj aliaj interŝtataj organizaĵoj, kiuj konformas al la celoj kaj idealoj de la Esperanto-Movado. Kelkaj ekzemploj sufiĉos por ilustri la karakteron de la laboro, farata rekte por tiu celo:

En la Esperanto-gazetaro regule aperadas *artikoloj kaj informoj* pri tiuj organizaĵoj kaj pri ilia aktivado koncerne edukadon, sciencon, kulturon, internacian kompreniĝon kaj mondan pacon. Tiele, en la revuo *Esperanto* estis publikigitaj studoj aŭ serioj da artikoloj pri la Universala Deklaracio, internaciaj konvencioj pri la homaj rajtoj, genocido, ĉefprojekto Oriento-Okcidento, lukto kontraŭ analfabetecon, esploroj de Unesko en la marbordaj regionoj de Norda Afriko sub la titolo „Homoj kontraŭ Dezerto", tradukoj, lingva situacio en UN kaj Unesko, la ĉefprojekto „Asociiĝintaj Lernejoj", lukto kontraŭ rasan diskriminacion, celebrado de elstaraj personecoj de la homaro (inter ili ankaŭ D-ro L. L. Zamenhof), savado de nubiaj monumentoj, diversaj ekspozicioj organizitaj de Unesko, kaj multaj aliaj. Preskaŭ ĉiuj Esperanto-periodaĵoj daŭre publikigas similajn artikolojn kaj sciigojn. Multe helpas la bulteno *Unesko-Novaĵoj*, eldonata de UEA kaj sendata senpage al la redakcioj de ĉiuj Esperanto-periodaĵoj. Ĝis marto 1973 en la Esperanto-gazetaro aperis pli ol 1.000 informoj ĉerpitaj ekskluzive el tiu bulteno. Ofte artikoloj, publikigitaj originale en Esperanto, aperas poste en nacilingvaj tradukoj (en unu kazo eĉ en 13 naciaj lingvoj), tiel ke ankaŭ tra tiu vojo diskoniĝas la pozitivaj agadoj de la interŝtataj organizaĵoj.

UEA partoprenis, kompreneble laŭ propraj programoj kaj emfazante sian starpunkton, en la *memorigoj de diversaj datrevenoj*, ekzemple la 25-jara datreveno de UN en 1970 aŭ la 25-jara de Unesko en 1971, aŭ en *mondskalaj kampanjoj* de UN, Unesko aŭ ambaŭ, interalie la Jaro de Internacia Kunlaboro (1965), Jaro de Homaj Rajtoj (1968), Internacia Jaro de Edukado (1970), Internacia Jaro de la Libro (1972), k.a. [10]. Specialan signifon havis la ĉefprojekto pri Reciproka Aprezado de Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj. La plej rimarkinda kontribuo de UEA estas la literatura Serio Oriento-Okcidento, kiu riĉigis kaj plu riĉigas la esperantlingvan kulturon per valoraj verkoj, kaj kiu fortikigis la pozicion de UEA en la konsultaj rilatoj kun Unesko.

En ISU [11] estas faritaj multaj *prelegoj* pri Unesko, UN, homaj rajtoj, internacia krimo, genocido kaj kultura genocido, jura reĝimo

10. V. ankaŭ Ĉap. 18.3.3.

11. Detaloj pri ISU troviĝas precipe en Ĉap. 20.4.

de Antarkto, metodoj aplikataj por solvado de internaciaj malkonsentoj, rolo de la Internacia Kortumo, kaŭzoj de malsamecoj inter la popoloj, pluraj edukaj demandoj, evolufazoj de monda ekonomio, k.a. Prelegoj pri tia temaro estas faritaj ankaŭ en diversaj internaciaj seminarioj, konferencoj, studrondoj kaj similaj kunvenoj. Multaj lokaj Esperanto-societoj okazigas iom solenajn kunsidojn por memorigi samtempe la datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof (15-a de decembro) kaj tiun de la Universala Deklaracio (10-a de decembro). En la kadro de tia aranĝo, ofte kun arta programo, kompetentaj personoj prelegas pri la Universala Deklaracio aŭ pri unuopaj homaj rajtoj. Se eble, vizitoj de kompetentaj eksterlandanoj estas utiligataj por la sama celo. Ekzemple, dum la granda prelegvojaĝo de Prof. I. Lapenna en 1949-1951, organizita de UEA, la preleganto faris ankaŭ 52 prelegojn pri demandoj rilatantaj al UN, la rolo de Unesko kaj, tute speciale, pri la signifo de la Universala Deklaracio.

13.4.2 Mondaj Kampanjoj por Homaj Rajtoj

Tri fojojn UEA organizis mondvastajn kampanjojn kun la celo diskonigi la enhavon de la Universala Deklaracio (UD), analizi ĝian juran valoron kaj moralan-politikan signifon, kuraĝigi la observadon de la homrajtoj, aparte atentigi pri la kulturaj rajtoj de la moderna homo kaj reliefigi la principon de lingva egaleco. Paralele estis traktataj la intertempe akceptitaj rezolucioj, konvencioj kaj paktoj fontantaj el la Universala Deklaracio, aŭ iel rilatantaj al ĝi.

En ĉiuj tri kazoj UEA agis en la kadro de siaj konsultaj rilatoj kun Unesko kaj de siaj oficialaj ligoj kun UN, laŭ la invitoj kaj ĝeneralaj programoj de tiuj organizaĵoj, sed konforme al siaj propraj laborplanoj.

13.4.2.1 *Dekjara Datreveno.* — La unua kampanjo estis organizita okaze de la dekjara datreveno de la Universala Deklaracio en 1958. La preparlaboroj komenciĝis jam fine de 1956, kiam UEA informis la Sekretariaton de UN, ke UEA akceptas ĝian proponon pri celebrado de tiu datreveno.

La centraj organoj de la Asocio informis ĉiujn landajn kaj fakajn organizaĵojn pri la datreveno, donis detalajn konsilojn, liveris materialojn por prelegoj kaj artikoloj. Siavice la landaj asocioj kaj fakaj organizaĵoj informis pri la afero la lokajn Esperanto-societojn, respektive la landajn sekciojn de fakaj organizaĵoj. Tiele, jam dum la preparlaboroj la datreveno estis vaste diskonigita. Al la organizantoj de la aranĝoj sur landa kaj loka niveloj estis donita ĝenerala konsilo, ke ili apogu la naciajn kaj lokajn komitatojn por memorigo de la datreveno, se tiaj komitatoj efektive formiĝos kaj

ekagos, aŭ ke la Esperanto-organizaĵoj mem okazigu la celebradon, se neniu tia komitato estos kreita en ilia lando aŭ loko.

Okaze de la datreveno Unesko publikigis fotoafiŝojn kun teksto en la Internacia Lingvo. La Esperantan tradukon kaj la distribuon de la du serioj, ĉiu po 500 ekzempleroj, prizorgis UEA. En kelkaj tagoj la tuta kvanto estis distribuita kaj multaj mendoj ne povis esti plenumitaj, ĉar la eldonkvanto estis tro malgranda. Okaze de la UK de Esperanto en Mainz (1958) unu prelego estis dediĉita al la Universala Deklaracio; ĉeestis pli ol 1.000 personoj. La datreveno esti aparte memorigita en la Komitato de UEA.

Laŭ la enketo farita de CED, en 62 landoj la Esperanto-organizaĵoj memorigis la datrevenon. En 22 landoj la lokaj Esperanto-societoj okazigis 243 prelegojn pri la Universala Deklaracio; ĉeestis pli ol 19.000 personoj. En 43 lokoj estis aranĝitaj publikaj kunvenoj kun paroladoj pri la Universala Deklaracio, recitaĵoj, muzikaj punktoj kaj ekspozicioj. Nur en Jugoslavio tiajn kunvenojn ĉeestis pli ol 5.000 personoj.

En 87 Esperanto-periodaĵoj aperis 108 artikoloj, informoj aŭ sciigoj pri la UD. Surbaze de la materialoj, liveritaj de la Esperanto-organizaĵoj, aperis 120 artikoloj en la naciaj lingvoj de diversaj landoj.

Ĉiuj radio-stacioj, kiuj tiutempe havis elsendojn en Esperanto, memorigis la datrevenon. Pli longajn prelegojn en Esperanto disaŭdigis la radio-stacioj Roma, Zagreb, Bern, Rio de Janeiro, Venezuelo.

En pluraj landoj kaj en multaj lokoj la Esperanto-organizaĵoj estis la solaj, kiuj memorigis en tiu aŭ alia formo la eventon. Tio speciale rilatas al multaj lokoj de Brazilo, Britio, Germanio, Hispanio, Jugoslavio, Pollando, Hungario kaj Venezuelo.

13.4.2.2 *Dekkvinjara Datreveno.* — La dua okazo estis la celebrado de la 15-jara datreveno de la Universala Deklaracio (UD) la 10-an de decembro 1963.

Jam komence de 1963 la Sekretariato de UN, kaj poste ankaŭ la Sekretariato de Unesko, turnis sin al ĉiuj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kontribui al la celebrado per diskonigo de la enhavo de la UD kaj per klarigoj pri la signifo de tiu grava dokumento. En julio 1963 la Estraro de UEA informis la Sekretariaton de Unesko, ke UEA volonte kunlaboros kaj maksimume kontribuos al la celebrado.

Efektive, jam en oktobro 1963 UEA atentigis ĉiujn landajn kaj fakajn asociojn, la redakciojn de la esperantlingvaj revuoj, gazetoj kaj bultenoj, kiel ankaŭ la direkciojn de la Esperanto-fakoj de radio-stacioj, pri la datreveno. Samtempe estis komunikita la laborplano de UEA por tiu okazo kaj donitaj sugestoj rilate ĝian realigon.

13 INSTRUMENTO DE INTERNACIA KOMPRENIĜO

Por faciligi la taskon de la Esperanto-organizaĵoj, speciale de la lokaj Esperanto-societoj, la Estraro de UEA donis la necesajn informojn pri havigo de taŭgaj materialoj por la celebrado, kaj aparte atentigis pri esperantlingvaj verkoj kaj studoj, kiuj pritraktas la enhavon de UD. Tio helpis la verkadon de artikoloj kaj prelegoj. Kun la sama celo, jam en la novembra numero de la revuo *Esperanto* aperis la kompleta teksto de la Universala Deklaracio en la Internacia Lingvo kaj konciza artikolo pri ĝia signifo. La teksto mem de la Deklaracio estis eldonita kiel aparta broŝuro kaj ĝustatempe distribuita.

Laŭ plia enketo farita de CED, la alvoko de la Estraro de UEA havis bonan eĥon. En novembro kaj decembro la Esperanto-periodaĵoj publikigis artikolojn aŭ longajn informojn pri la UD. La radio-stacioj, kiuj disaŭdigas en la Internacia Lingvo, dediĉis apartajn programojn al la UD. Tre granda nombro da lokaj grupoj okazigis specialajn kunvenojn. Ĉie oni distribuis la tekston de la Deklaracio. La kunvenojn meze ĉeestis inter 30 kaj 100 personoj, sed en pluraj kazoj konsiderinde pli, ekzemple en Munkeno ĉ. 300.

Ne estas konata la nombro de prelegoj aŭ memorigoj, kiujn, laŭ la konsiloj en la laborplano, faris profesoroj kaj instruistoj en universitatoj kaj lernejoj. Konsiderante la fakton, ke tiutempe Esperanto estis instruata en preskaŭ 600 lernejoj de 32 landoj, oni povas kalkuli ke, se ne en ĉiuj, do almenaŭ en la plimulto el ili la UD estis memorigita. Rezulte de la agado de la Esperanto-organizaĵoj, unuavice de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio kaj de ĝiaj membroj, aperis minimume 147 artikoloj aŭ informoj pri la UD en nacilingvaj taggazetoj kaj revuoj. En pluraj kazoj oni publikigis en nacilingvaj tradukoj la artikolon pri la signifo de la UD, publikigita en la revuo *Esperanto* (v. supre). Rimarkinda estas la fakto, ke la Esperanto-organizaĵoj sukcesis diskonigi la UD eĉ en regionoj tre malfacile atingeblaj per aliaj vojoj. Karakteriza estas la publikigo de la menciita artikolo pri la signifo de la UD en la plej granda gazeto de Mozambiko *A Tribuna* precize la 10-an de decembro.

13.4.2.3 *Jaro de Homaj Rajtoj.* — La tria kaj plej impona kampanjo estis realigita en 1968 okaze de la Internacia Jaro de Homaj Rajtoj (IJHR).

La 22-an de julio 1964 la Departemento pri Homaj Rajtoj de UN komunikis al ĉiuj neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj, inkluzive UEA, la Rezolucion 1961 (XVIII) sub la titolo „Proklamo de 1968 kiel Internacia Jaro de Homaj Rajtoj", akceptitan de la Ĝenerala Asembleo la 12-an de decembro 1963. Samtempe la Ĝenerala Sekretario de UN invitis ĉiujn organizaĵojn prezenti siajn sugestojn kaj proponojn por la programo de entreprenotaj agadoj en ligo kun

la IJHR. La Estraro de UEA akceptis la inviton kaj prezentis nombron da sugestoj kaj proponoj al la Sekretariato de UN. En pluraj postaj okazoj UEA informis la kompetentajn instancojn de UN, de Unesko, kiel ankaŭ la Internacian Komitaton de Neregistaraj Organizaĵoj (NRO-j) en Ĝenevo pri la preparlaboroj de UEA sur tiu ĉi kampo.

Meze de 1966 la laborplano de UEA por la IJHR, verkita de la Estraro, estis aprobita de la Komitato de UEA. En septembro ĝi estis sendita al la Internacia Komitato en Ĝenevo. La plano konsistis el pluraj punktoj kun emfazo je kulturaj rajtoj. La prezidanto de UEA estis komisiita organizi ĉiujn agadojn de la Asocio por la IJHR. La plano estis plenumata dum la tuta jaro kaj komplete realigita fine de 1968.

La Esperanto-traduko de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (UD), kiu estis unue publikigita en 1963, aperis en la dua eldono en 1967; la tria eldono aperis en februaro, 1968, kaj la kvara en aprilo de la sama jaro, entute en 20.000 ekzempleroj. El leteroj adresitaj al la centraj organoj de UEA sekvas, ke multaj personoj en diversaj landoj, speciale en Azio kaj Afriko, havis la okazon legi la tekston de la UD por la unua fojo ekde kiam ĝi estis akceptita en 1948.

Kvarkolora glumarko, speciale dediĉita al tiu ĉi evento, estis publikigita komence de 1968 en pluraj miloj da ekzempleroj; ĝi estis uzata en 1968 sur kovertoj kaj poŝtkartoj. La glumarkoj havis la emblemon de IJHR kaj la tekston: „Por la Internacia Lingvo — Kontraŭ Lingva Diskriminacio — 1968 Jaro de Homaj Rajtoj".

La ĉefaj periodaĵoj de la Asocio kaj de ĝia junulara sekcio *Esperanto, La Praktiko* kaj *Kontakto* publikigis 56 artikolojn kaj informojn pri la UD aŭ pri la unuopaj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Pli ol 400 artikoloj kaj mallongaj informoj pri la homaj rajtoj aŭ pri la IJHR estis publikigitaj en la aliaj Esperanto-periodaĵoj. Kelkaj el la artikoloj estis poste tradukitaj en naciajn lingvojn, kaj ili aperis ankaŭ en nacilingvaj gazetoj kaj revuoj. Ekzemple, la artikolo „Kultura Genocido kaj Homaj Rajtoj", publikigita en la decembra *Esperanto,* aperis poste en pluraj nacilingvaj tradukoj, inter kiuj en la hispana, franca, itala, germana, angla kaj hungara.

La UK en Madrid (1968) estis fakte dediĉita al IJHR. Unu el la ĉefaj temoj estis „La Universala Deklaracio kaj Lingva Diskriminacio". En unu prelego en ISU estis pritraktita la demando pri la jura signifo kaj morala forto de la UD. Inter la temoj de la oratora konkurso por la junularo, du rilatis al la UD: „Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj" (Art. 1 de la UD);

„La egaleco de seksoj en la UD". La konferenco organizita de la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj diskutis pri la libereco de asociiĝo kaj kunvenado laŭ la juro de diversaj landoj; estis prezentitaj raportoj pri la jura situacio sur tiu ĉi kampo en 9 landoj. La Kongreso formulis siajn konkludojn en Rezolucio pri la kulturaj rajtoj kaj lingva diskriminacio.

Internacia Seminario pri Fundamentaj Homaj Rajtoj kaj Liberecoj okazis en Sonnenberg (F.R.Germanio) de la 20-a ĝis la 29-a de septembro 1968. La Seminarion partoprenis 80 pedagogoj el 18 landoj. Kompetentaj fakuloj faris 14 prelegojn pri la unuopaj politikaj, sociaj, kulturaj kaj ekonomiaj rajtoj entenataj en la Universala Deklaracio kaj en la du Paktoj pri Homaj Rajtoj. Unu el la prelegoj estis dediĉita al la antaŭvidita maŝinaro por la protekto de la homaj rajtoj. La germana gazetaro, radio kaj televido dediĉis grandan atenton al la laboro de la Seminario.

Dudeko da radio-stacioj havis entute almenaŭ 100 erojn en Esperanto, dediĉitajn al la UD, aŭ alimaniere ligitajn al la IJHR. Observantoj de UEA partoprenis en la Seminario de UN pri la Homaj Rajtoj en Multnaciaj Socioj, okazinta en Beograd jam en 1965, kaj en la Seminario de UN pri la Libereco de Asociiĝo, okazinta en Londono meze de 1968. UEA estis ankaŭ reprezentita en la Konferenco de NRO-j pri la Homaj Rajtoj, okazinta en la Sekretariato de Unesko en Parizo en septembro 1968. La delegacio de UEA estis devigita proteste forlasi la Konferencon, ĉar la principo de egaleco de lingvoj kiel establita en la Ĉarto de UN kaj en la lingvaj reguloj de interŝtataj organizaĵoj, ne estis respektata en tiu ĉi Konferenco pri la Homaj Rajtoj. *Le Figaro*, *Combat* kaj aliaj francaj gazetoj raportis. Same la ĉefaj presagentejoj. Rezulte de tiu firma starpunkto de UEA kaj de ĝia posta insistado, en 1971 estis fine ŝanĝita la Procedura Regularo de la Konferencoj de NRO-j, konforme al la postuloj de UEA.

Per la Rezolucio 1 de la UK en Madrid ĉiuj landaj Esperanto-organizaĵoj estis invititaj „instigi siajn registarojn akcepti, konforme al la respektivaj konstituciaj proceduroj, ĉiujn konvenciojn rilatantajn al la Homaj Rajtoj, por kiuj ili voĉdonis, precipe la Pakton pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, la Pakton pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj, kaj la Fakultativan Protokolon al tiu Pakto". Similan rezolucion akceptis ankaŭ la Seminario en Sonnenberg.

CED plenumis sian parton de la laborplano, speciale koncerne la kostojn de multlingveco kaj diversajn formojn de lingva diskriminacio sur landa kaj internacia niveloj. Konforme al la plano, la 10-an de decembro 1968 aperis la unua numero de la altnivela scienca periodaĵo *La Monda Lingvo-Problemo* kun artikoloj en diversaj naciaj lingvoj kaj ampleksaj resumoj en Esperanto.

13.4 POR HOMAJ RAJTOJ KAJ INTERNACIA KUNLABORO

La IJHR estis kontentige plenumita ankaŭ sur la landa kaj loka niveloj. Artikoloj kaj informoj aperis en la organoj de la Esperanto-organizaĵoj. Ĉ. 600 artikoloj kaj informoj estis publikigitaj en nacilingvaj gazetoj kaj revuoj dank' al la klopodoj de la Esperanto-organizaĵoj, aŭ rezulte de la UK en Madrid, de konferencoj, seminarioj kaj aliaj renkontiĝoj rilatantaj al homaj rajtoj, kaj organizitaj de la landaj asocioj aŭ lokaj Esperanto-societoj. Landaj kaj regionaj Esperanto-kongresoj, okazintaj en printempo kaj aŭtuno, 1968, en 22 landoj, memorigis la IJHR diversmaniere, kelkfoje per prelegoj rilatantaj al enlandaj aŭ lokaj problemoj en ligo kun la homaj rajtoj. En decembro okazis kunvenoj en la lokaj Esperanto-societoj, kiujn versajne ĉeestis ĉ. 20.000 personoj. Instruistoj de Esperanto en lernejoj de 32 landoj, en kiuj Esperanto estas instruata, estis kuraĝigitaj fari prelegojn pri la UD, unuavice pri la kulturaj kaj lingvaj rajtoj ligitaj al lokaj cirkonstancoj. La plimulto sendube observis la rekomendon.

Kelkaj landaj asocioj entreprenis ankaŭ aliajn agadojn. Ekzemple, la dana kaj sveda Esperanto-asocioj eldonis specialajn memorigajn poŝtkartojn en kelkaj miloj da ekzempleroj; la nederlanda, germana kaj argentina Esperanto-organizaĵoj eldonis flugfoliojn kaj broŝurojn pri la homaj rajtoj; multaj lokaj societoj okazigis diskutojn pri enlandaj problemoj ligitaj al homaj rajtoj kaj diversaj formoj de diskriminacio.

Estas tre malfacile taksi la rezultojn de ĉiuj-ĉi klopodoj, sed oni povas diri kun granda versajno, ke ne troviĝas unusola persono scianta Esperanton, kiu ne estus aŭdinta almenaŭ ion pri la IJHR aŭ pri la UD aŭ pri unuopaj homaj rajtoj dum tiu granda kampanja jaro.

13.4.3 Jaro de Internacia Kunlaboro (JIK)

13.4.3.1 *Origino.* — Konforme al la Rezolucio de la 19-a de decembro 1962, la Ĝenerala Asembleo proklamis per sia Rezolucio 1907 (XVIII) la jaron 1965, okaze de la 20-a datreveno de la fondiĝo de UN, „Jaro de Internacia Kunlaboro". Por harmoniigi la agadon, UN fondis apartan Preparkomitaton, kies prezidanto turnis sin al neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UN aŭ Unesko, interalie ankaŭ al UEA, kun la peto kontribui al la celoj difinitaj por JIK. Ankaŭ la Ĝenerala Direktoro de Unesko sendis inviton en la sama senco, kaj atentigis pri la ebleco kunligi la agadon okaze de la JIK kun la celebrado de la 20-jara datreveno de Unesko en 1965.

En majo 1963, per letero direktita al la Sekretariato de UN, UEA akceptis la inviton kaj tuj komencis la preparlaborojn. La Estraro

de la Asocio informis pri la afero ĉiujn aliĝintajn kaj kunlaborantajn Esperanto-organizaĵojn, kaj petis sugestojn rilate la formon kaj metodojn, kiuj ebligos al UEA kaj ĝiaj organizaĵoj plej efike helpi al la realigo de la celoj de JIK.

Rezulte de multnombraj respondoj ricevitaj de la landaj asocioj kaj fakaj organizaĵoj, la Estraro ellaboris la unuan projekton de la agadplano, kiun ĝi prezentis al la Komitato dum la UK en Hago (1964). Aparta komisiono de la Komitato studis la projekton, faris kelkajn utilajn amendojn kaj prezentis la tuton al plena kunsido de la Komitato, kiu ĉiuvoĉe akceptis ĝin la 7-an de aŭgusto. Siavice, la tuta kongreso, per sia rezolucio de la 8-a de aŭgusto, akceptita ĉiuvoĉe, decidis doni sian plenan apogon al la klopodoj de UN en la JIK, kaj samtempe atentigi pri la lingvodiverseco kiel unu el la plej gravaj obstakloj al plua intensigo kaj vastigo de internacia kunlaboro.

La Laborplano de UEA okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro (JIK) estis la plej ampleksa el ĉiuj specialaj laborplanoj [12]. Ĝi konsistis el enkonduko kaj du ĉefaj partoj; en kvar sekcioj kaj 42 punktoj, ĉiu kun pluraj eroj, la plano formulis la taskojn de la centraj organoj de UEA, kaj tiujn de la landaj asocioj, lokaj societoj kaj fakaj organizaĵoj [13].

Konforme al la sugestoj entenataj en la rezolucioj de UN kaj komunikitaj fare de la Sekretariato al ĉiuj NRO-j, la unua parto de la laborplano de UEA rilatis al diskonigo de la JIK, al progresigo de kunlaborado inter la popoloj, al internacia interkompreniĝo, al forigo de tensioj kaj fortikigo de la monda paco. La dua grupo de agadoj, firme ligita al la unua, koncernis la solvon de la lingva problemo en internaciaj rilatoj, sen kio ne estas imagebla pli profunda kaj pli vasta internacia kompreniĝo. Ankaŭ por tiu dua celo estis utiligotaj ĉiuj disponeblaj rimedoj de dokumentado kaj informado.

Koncizaj informoj pri la atingitaj rezultoj troviĝas en la sekvantaj du punktoj.

12. Pri la okazaj laborplanoj de UEA v. Ĉap. 18.3.4.

13. La teksto de la laborplano estis poste publikigita en la *Jarlibro* de UEA (1965), en la januara numero de *Esperanto* (1965), kaj ankaŭ aparte sendita al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj. Ĝi aperis kiel dokumento de CED I/VII/4 en Esperanto kaj en la angla. La angla teksto estis komunikita al la Sekretariato de UN, al la Ĝenerala Direktoro de Unesko, al nombro da aliaj interŝtataj organizaĵoj kaj al ĉiuj NRO-j en konsultaj rilatoj kun Unesko. Pri la plenumo de la plano okupiĝis la Estraro sub la gvido de la prezidanto. La ampleksan teknikan laboron faris la CO de UEA.



La prestiĝa literatura Serio Oriento-Okcidento, eldonata sub aŭspicio de UEA, estas signifa kontribuo ne nur al la Esperanta traduka literaturo, sed ankaŭ al la realigo de la ĉefprojekto de Unesko.

13.4.3.2 *Agadoj sur Internacia Nivelo.* — En la revuo *Esperanto* aperis 18 artikoloj aŭ informoj pri la JIK, 8 pri UN kaj 3 pri Unesko. Menciindaj estas la artikoloj „Antaŭ Dudek Jaroj", „La Homaj Rajtoj", „Dudek Jaroj de UN" kaj „Lukto kontraŭ Malsato". En la aliaj revuoj de la Asocio kaj de ĝia junulara sekcio — *Monda Kulturo, La Praktiko, Kontakto* — aperis tuta aro da kontribuaĵoj pri JIK mem, UN, homrajtoj kaj diskriminacio, inkluzive la lingvan diskriminacion.

La 50-a UK de Esperanto en Tokio pritraktis la ĉeftemon „Aspektoj de Internacia Kunlaboro". D-ro V. Sadler raportis pri la Ĉefprojekto Oriento-Okcidento, dum Prof. I. Lapenna preparis raporton pri Jaro de Internacia Kunlaboro. En ISU unu el la prelegoj rilatis al Dudekjara Evoluo de Unuiĝintaj Nacioj. La preleginto prezentis la formiĝon kaj ekeston de UN, la strukturan diferencon inter UN kaj Ligo de Nacioj, la ĉefajn organojn de UN kaj la plej gravajn aspektojn de laboro de la monda organizaĵo. Por la Oratora Konkurso por la junularo en 1965 estis difinitaj 7 temoj, el kiuj 5 rilatis al UN kaj Internacia Kunlaboro: la signifo de UN hodiaŭ kaj morgaŭ; reciproka influado de Orienta kaj Okcidenta Civilizoj; helpo al evoluantaj landoj; diferencoj inter riĉaj kaj malriĉaj landoj; la rolo de la esperantista junularo en la intensigo de kunlaboro inter la tutmonda junularo.

La centraj organoj de la Asocio sendis al la aliĝintaj kaj kunlaborantaj organizaĵoj, al la Esperanto-sekcioj de la radio-stacioj kaj al aliaj instancoj multajn informojn pri la evoluo de tiu ĉi kampanjo de UN, pri UN mem kaj Unesko, parte per cirkuleroj, parte per la *Bulteno de Internacia Gazetara Servo* kaj parte per la bulteno *Unesko-Novaĵoj.*

En la serio Oriento-Okcidento aperis du pliaj gravaj verkoj: la fama *Kalevala,* tradukita el la finna, kaj la tragedio *Reĝo Lear* de Shakespeare, tradukita el la angla.

En 1965 konsiderinde vastiĝis la internacia individua kaj kolektiva korespondado, precipe inter la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata. La fakaj Esperanto-organizaĵoj — unuavice la instruista, jurista kaj ĵurnalista — plenumis siajn partojn de la programo per prelegoj, artikoloj kaj alimaniere.

Ankaŭ la junulara sekcio de UEA estis tre aktiva. Aldone al la menciitaj altnivelaj artikoloj en *Kontakto,* ĝi organizis lingvan seminarion en Podvin, apud Ljubljana (Jugoslavio). En la seminario partoprenis la reprezentantoj de Internacia Instituto por la Paco kaj de la Anne Frank Fondaĵo (Nederlando), kiel ankaŭ la reprezentantoj de 10 junularaj neregistaraj organizaĵoj, inter kiuj Studenta Movado por UN, Mondfederalista Junularo, Monda Universitata Servo.

13.4 POR HOMAJ RAJTOJ KAJ INTERNACIA KUNLABORO

CED publikigis du specialajn dokumentojn. La unua estis *La Eduka Valoro de la Instruado de Esperanto en la Lernejoj*, studo verkita de Raif Markarian, en Esperanto kaj en la angla; la dua estis *Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo (Esperanto)*. Ĝi aperis unue en la Internacia Lingvo kaj poste, en la sama jaro, en la angla, hispana, pola, japana, franca kaj nederlanda tradukoj. En la sekvaj jaroj aperis tradukoj ankaŭ en aliaj lingvoj kaj ĝisdatigitaj pliaj eldonoj en la menciitaj naciaj lingvoj.

Por memorigi la JIK kaj atentigi pri Esperanto, la Asocio eldonis belaspektan glumarkon en 30.000 ekzempleroj, sur kiu troviĝis jena teksto: „Jaro de Internacia Kunlaboro — 1965 — Jaro de la Internacia Lingvo Esperanto". Ĝi estis uzata sur korespondaĵoj de la Asocio, de aliaj Esperanto-organizaĵoj kaj de la membraro.

La 49-a UK de Esperanto en Hago (1964) akceptis en la ferma kunsido de la 8-a de aŭgusto Rezolucion, kiu servis kiel bazo de la Propono, poste prezentita al UN [14].

13.4.3.3 *Agadoj sur Landa kaj Loka Niveloj.* — Laŭ la informoj ricevitaj en CED el diversaj landoj, la Laborplano de UEA por la JIK estis sukcese plenumita ankaŭ sur la landa kaj loka niveloj. Unu el la sugestoj estis, ke la landaj Esperanto-organizaĵoj donu sian apogon al la naciaj komitatoj por agadoj okaze de JIK, se tiaj komitatoj fakte formiĝis. Montriĝis, ke en relative malmultaj landoj efike funkciis tiaj komitatoj. Tamen, en kelkaj landoj, ekzemple en Belgio, Britio, Hispanio, Nederlando kaj Novzelando, la Esperanto-organizaĵoj estis reprezentitaj en la naciaj komitatoj, dum en aliaj landoj la Esperanto-organizaĵoj havis kontakton kun la naciaj asocioj por UN. En tiuj kaj en ĉiuj aliaj kazoj la Esperanto-organizaĵoj klopodis kiel eble plej efike plenumi la agadprogramon de UEA sur nacia nivelo. La ĉefaj rezultoj estas:

Entute aperis 264 artikoloj kaj informoj pri JIK, UN, Unesko kaj aliaj interŝtataj organizaĵoj en la organoj publikigataj de Esperanto-unuiĝoj. Dank' al la agado de la Esperanto-organizaĵoj, en la nacilingvaj gazetoj kaj revuoj estis publikigitaj 1.560 artikoloj en ligo kun JIK, inkluzive artikolojn tradukitajn el la Esperanto-periodaĵoj. La eldonnombro de ĉiuj gazetoj kaj revuoj, en kiuj aperis la menciitaj artikoloj, estas pli ol 40 milionoj.

Entute 19 radio-stacioj en 13 landoj havis 46 programojn rilatantajn al JIK. Kompreneble, temas pri programoj en la Internacia Lingvo. Krome, dank' al la agado de la Esperanto-organizaĵoj, estis disaŭdigitaj 121 mallongaj programoj aŭ informoj en diversaj naciaj lingvoj.

14. La tekston de la Rezolucio kaj detalojn pri la Propono v. en Ĉap. 22.

Precize 46 landaj aŭ regionaj Esperanto-kongresoj en 22 landoj memorigis diversmaniere tiun jaron. La aranĝojn ĉeestis ĉ. 5.300 personoj. Aliflanke, en la lokaj Esperanto-organizaĵoj okazis 606 prelegoj aŭ solenaĵoj pri JIK aŭ en ligo kun ĝi; ĉeestis ĉ. 16.000 personoj.

En nombro da universitatoj kaj lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata, la profesoroj aŭ instruistoj faris 126 prelegojn pri UN aŭ JIK al ĉ. 8.000 gelernantoj.

Necesas rimarkigi, ke ĉiuj supraj ciferoj devas esti rigardataj kiel minimumaj, ĉar ili baziĝas ekskluzive sur raportoj ricevitaj en CED ĝis aprilo 1966. El multaj aliaj landoj, en kiuj la Esperanto-organizaĵoj certe agis konforme al la laborplano, ne venis informoj tiom precizaj, ke ili povus esti prenitaj en konsideron.

13.4.4 Konkludo

Sen troigo oni povas taksi, ke dank' al la grandaj kampanjoj de UEA sur la internacia, landa kaj loka niveloj multaj milionoj da homoj sciiĝis pri la Universala Deklaracio kaj pri la vojoj, kiujn necesus sekvi por pli efike protekti la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn; pri la klopodoj direktitaj al internacia kunlaborado, kaj pri la baroj, kiuj obstaklas la klopodojn. Ĉirkaŭ 50 milionoj da personoj estis informitaj en tiu aŭ alia maniero sole pri JIK kaj pri la ĉefaj aspektoj de la laboro de Unuiĝintaj Nacioj.

Aliflanke, ĉiuj kampanjoj donis bonegajn rezultojn ankaŭ el vidpunkto de serioza kaj trafa informado pri la Internacia Lingvo. La fakto, ke tiu tuta enorma laboro, kiu postulis precizan planadon, firman organizitecon kaj multe da persona sindediĉo, povis esti realigita dank' al Esperanto, per si mem plifortigis la poziciojn de UEA kaj altigis la prestiĝon de la lingvo. Siavice, la kampanjoj ebligis amase atentigi pri la lingva problemo en ĉiuj ĝiaj aspektoj, pri la pozitiva rolo de Esperanto en la nuntempa socio kaj pri ĝiaj perspektivoj en la estonteco.

13.5 UEA KANDIDATO POR LA NOBEL-PACPREMIO

La laboro de UEA por internacia kompreniĝo kaj monda paco akiris al la Asocio la simpatiojn de multaj elstaraj personoj, sincere dediĉitaj al amikaj rilatoj inter la popoloj. Jam en januaro 1954 la norvega parlamentano Carl Henry prezentis proponon al la Nobel-Komitato de la Norvega Parlamento, ke UEA ricevu la Nobel-Premion por la Paco. Post kelkjara intervalo, en 1960, estis ellaborita pli detala propono, konforma al la Statuto de la Nobel-Fondaĵo, per kiu UEA estis kandidatigita por la Pacpremio en 1961. Ĉi-foje la proponon faris 65

kvalifikitaj personoj[15] el 17 landoj, inter kiuj la Ĉefministro de Danlando, pluraj ministroj, deputitoj, senatanoj kaj profesoroj de universitatoj.

Ekde 1961 ĝis 1973 preskaŭ ĉiujare UEA estis kandidato. Entute estis faritaj precize 723 proponoj favore al UEA. Kompreneble, la nombro de proponoj estas pli alta ol la nombro de proponintoj, ĉar sufiĉe multaj el ili kandidatigis la Asocion du aŭ plurajn fojojn, ĉu en sinsekvaj jaroj, ĉu kun intervaloj.

La plej granda nombro da proponoj estis farita en la Jaro de Internacia Kunlaboro (1965). En tiu jaro 253 kvalifikitaj personoj kandidatigis UEA por la Pacpremio. Inter la proponintoj troviĝis 72 svedaj parlamentanoj, 60 nederlandaj parlamentanoj (preskaŭ duono de la Nederlanda Parlamento), 28 finnaj parlamentanoj kaj pluraj membroj de parlamentoj de aliaj landoj. Inter la proponintoj troviĝis, plue, membroj de sciencaj akademioj, rektoroj kaj profesoroj de universitatoj, ĉefministro, ministroj kaj estintaj ministroj, k.a., ĉiuj elstaraj, ofte mondfamaj personecoj en la sferoj de politiko, juro, filozofio, artoj kaj sciencoj.

UEA ĝis nun ne ricevis la Pacpremion. Ankaŭ aliaj meritplenaj personoj kaj organizaĵoj ne ricevis ĝin, kvankam ili estis kandidatoj. Tre verŝajne UEA denove estos kandidato kaj povas okazi, ke ĝia porpaca laboro estos rekonita ankaŭ tiamaniere, ke ĝi ricevos la Nobel-Pacpremion. Aliflanke, la nura fakto, ke UEA estis kandidato de kelkcentoj da alte kvalifikitaj personoj en la lastaj jaroj, per si mem estas pozitiva. Pri la kandidatigoj de UEA aperis centoj da mallongaj informoj en la monda gazetaro, kio helpis la diskonigon inter la amasoj de ĝia laboro por la monda paco. Superflue diri, ke per tio estis donita apogo ankaŭ al la disvastigado de la lingvo. Tute egale ĉu UEA ricevos la Pacpremion aŭ ne, ĝi daŭrigos la laboron, el kiu granda parto estas rekte dediĉita al internacia kompreniĝo kaj paco inter la popoloj.

15. Laŭ la Statuto de la Nobel-Fondaĵo, nur difinitaj kategorioj de personoj rajtas fari proponojn pri kandidatoj. Tiuj „kvalifikitaj" personoj estas: membroj kaj estintaj membroj de la Nobel-Komitato kaj konsilistoj nomitaj de la Norvega Nobel-Instituto; parlamentanoj kaj membroj de registaroj, kiel ankaŭ membroj de la Interparlamenta Unio; membroj de la Internacia Arbitracia Kortumo en Hago; membroj de la Konsilantaro de la Internacia Paca Buroo; membroj de la Instituto de Internacia Juro; universitataj profesoroj de politika scienco, aŭ de juro, aŭ de historio, aŭ de filozofio (ne de aliaj objektoj); personoj, kiuj jam ricevis la Nobel-Pacpremion.

13.6 ESENCA BIBLIOGRAFIO

Lapenna, I. (red.), *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro.* Londono 1960.
Ŝirjaev, I. (ĉefred.), *Enciklopedio de Esperanto.* Vol. II. Budapest 1934-35.
Zamenhof, L. L., *Originala Verkaro* (Antaŭparoloj — Gazetartikoloj — Traktaĵoj — Paroladoj — Leteroj — Poemoj, kolektitaj kaj ordigitaj de D-ro Joh. Dietterle). Leipzig 1929.
Dokumentoj:
Dokumentoj de CED en la Serioj CED/INT./12, A/VI, I/II.
Kongresaj Regularoj de 1948, 1954, 1955 kaj 1956, laste reviziita en aŭgusto 1971.
Statuto kaj Regularoj de UEA. Rotterdam 1968.
Noto: Aldone al esenca bibliografio, entenata en la lastaj sekcioj de Ĉap. 11, 12 kaj 13, por la verkado de tiu ĉi parto de la libro estas utiligitaj multnombraj dokumentoj en la arkivo de CED. Tio precipe rilatas al statistikaj informoj kaj diversaj enketoj.

KVARA PARTO

HISTORIO KAJ NUNTEMPA ORGANIZO DE LA ESPERANTO-MOVADO

ĈAPITRO 14

ANALIZA SKIZO PRI LA HISTORIO DE LA MONDA ORGANIZO

14.1 ENKONDUKO

Kiam Zamenhof en 1887 transdonis al la publiko sian broŝuron, la rezulton de siaj junaĝaj revoj kaj multjara elprovado, li apenaŭ havis difinitajn imagojn pri la atendebla resono, des malpli pri la plej efika metodo kiel progresigi la Lingvon Internacian, kiel varbi adeptojn, kiel konservi kaj laborigi varbitojn. Tamen, dekomence li konsciis pri unu baza antaŭkondiĉo por la disvastiĝo de Esperanto. Jam en la Unua Libro li deklaris: „Por ke lingvo estu universala, ne sufiĉas nomi ĝin tia." Kaj: „Lingvo Internacia, kiel ĉiu nacia, estas proprajo de ĉiuj." Rezignante ĉiujn personajn rajtojn pri sia projekto, Zamenhof konsideris sin ne kreinto, sed nur iniciatoro de la lingvo. Unu jaron poste li precizigis, ke la Unua Libro servu nur kiel komuna fundamento, ke la proponita lingvo „devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiuj estis ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj", kaj ke, sekve, li ne volas laŭ „persona plaĉo" krei „la lingvon de l'kapo ĝis la piedoj". Tiu ĉi ideo pri evoluo de internacia lingvo surbaze de kolektiva uzado, sendepende de aparta persono, estis neniam antaŭe de iu esprimita, kaj la Deklaracio de Bulonjo poste formulos ĝin kiel unu el la ĉefaj principoj de esperantismo. Tute ne influite de aliaj sistemoj kaj ankoraŭ ne konante la sorton de Volapük, kies majstro insistis pri sia intelekta proprajo kaj per sia ordonemo mem subpremis ĝian liberan disfloradon, Zamenhof rezervis al la homa socio kaj al la ĉiutaga vivo la taskon prijuĝi, vivteni kaj evoluigi Esperanton.

Krom la universaleco de la celo — Esperanto ja kontentigis difinitan bezonon je internacia komunikado — kaj la strukturo kaj vortaro ĝis maksimumo internaciaj, unu plia kaŭzo por la sukceso de Zamenhof estas la idea fono de la lingvo. „Ni donu animon al nia lingvo", li skribis al Borovko, celante inspiri al ĝi la ideon de egaleco de ĉiuj nacioj, de internacia frateco inter la popoloj. Ĝuste tiu spirita bazo de Esperanto, la t.n. „interna ideo", pruvis sian potencon dum la postaj jardekoj, helpante venkigi la lingvon eĉ tiam, kiam ĝi estis interpretata en maniero diferenca de la konceptoj de Zamenhof.

Zamenhof ne preteratentis la indiferentecon de la homaro. Ankoraŭ tre naiva estis la unue proponita vojo por disvastigi Esperanton. La legantoj de la Unua Libro estis petitaj subskribi kaj resendi al la aŭtoro kuponojn kun la jena promeso: „Mi, subskribi-(n)ta, promesas ellerni la proponitan de d-ro Esperanto lingvon internacian, se estos montrita, ke dek milionoj (da) personoj donis publike tian saman promeson." Sed anstataŭ nur promesi — la plej multaj interesiĝantoj efektive lernis kaj ekuzis la lingvon, kiel baldaŭ pruvis centoj da leteroj, kiuj alvenadis ĉe Zamenhof. Lin alfrontis surpriza ŝanco en 1888, kiam Amerika Filozofia Societo, kondamninte Volapük, ofertis submeti Esperanton al internacia kongreso de kleruloj por ekzameniĝo. Zamenhof ĝoje konsentis, volante fordoni la tutan sorton de sia lingvo al tiu kongreso kaj opiniante sian rolon jam finita — sed la entrepreno fiaskis pro nesufiĉa interesiĝo de la invititaj sciencistoj. La fido de Zamenhof je la ebleco utiligi aŭtoritatojn kaj registarojn ricevis la unuan fortan baton, tiel ke li komencis direkti sian atenton al fortikigo de la propraj vicoj, per literaturaj verkoj, unuaj provoj de praktika uzo kaj modera apelado al idealismo.

14.2 SURVOJE AL INTERNACIA ORGANIZIĜO (1888-1908)

14.2.1 Unuaj Lokaj Societoj kaj Internaciaj Kontaktoj

Intertempe jam formiĝis la unuaj lokaj grupoj — en Nürnberg la tuta volapukista klubo transiris al Esperanto en 1888, krome kluboj en Odessa, Moskvo, Sofio, Munkeno, Uppsala, Peterburgo, Málaga, Vilnius, Varsovio k.a.; precipe multaj Rusoj, judaj kleruloj kaj granda nombro da tolstojanoj, aliĝis al la lingvo, kiu aperis al ili „kiel beninda savilo kaj nova espero" (Privat) en la trista intelekta kaj socia atmosfero sub la cara reĝimo. Tiuj unuaj esperantistoj jam estis pacifistoj, kleristoj aŭ liberaluloj, antaŭ ol ili konatiĝis kun Esperanto, kiun ili tiam, kuraĝigitaj de Tolstoj mem,

14.2 SURVOJE AL INTERNACIA ORGANIZIĜO (1888-1908)

alprenis por akceli la bonon de la homaro; aparta esperantista mistiko ekfloris nur depost ĉ. 1900, ĝis certa grado akceptante la impulsojn de la rusaj idealistoj.

Inter kelkcento da diverslandaj adeptoj, kiuj antaŭe nur povis korespondi kun Zamenhof, ekde la 1-a de septembro 1889 servis kiel tre efika ligilo kaj kuraĝigilo la revuo *La Esperantisto*, aperanta en Nürnberg. En ĝia tria numero Zamenhof proponis la kreon de Tutmonda Ligo de Esperantistoj „kiel sola kaj absoluta leĝdonanto en nia afero", al kies decidoj li promesis sian submetiĝon. Per tio li revenis al intenco, formulita jam en la Aldono al la Dua Libro, ke, alternative al internacia kongreso por elekto de internacia lingvo, la esperantistoj mem preparu tian kongreson aŭ akademion, dume zorgante nur pri „fortigado kaj vastigado" de Esperanto. En junio 1890 aperis en *La Esperantisto* Regularo de la Ligo Internacia de Esperantistoj kaj de Akademio „konsistanta el 10 personoj, elektataj ĉiujare per voĉdonado de ĉiuj kluboj de la Ligo", sed en decembro Zamenhof, nun mem redaktoro kaj eldonanto de la revuo, konfesis, ke la Ligo estas „infano malvive naskita".

La troa fervoro de la klubanoj en Nürnberg, kiuj enmetis gravajn ŝanĝojn en la projekton de Zamenhof, kulpis pri aro da miskomprenoj kaj la unuaj seriozaj disputoj en la juna Movado; pro sia individuismo, la unuaj esperantistoj kontraŭstaris al ia pli firma organiziĝo, time atendante de tio aŭtoritatecajn ŝanĝojn en la lingvo, dum pri nacia grupiĝo oni tiutempe ankoraŭ ne pensis.

La plano de Ligo eĉ pli senkreditiĝis en 1893/94, kiam, sekve de postuloj pri reformoj, Zamenhof, por eskapi la ĉefan respondecon, denove proponis Internacian Ligon Esperantistan (januaro 1893), kiun ĉifoje konsistigu simple la abonantoj de *La Esperantisto* kaj kiun li petis en aŭgusto kaj novembro 1894 voĉdoni pri lia projekto de reformoj. Klara plimulto esprimis sin kontraŭ ĉiaj lingvaj ŝanĝoj, metante per tio finan punkton al senĉesa diskutado kaj, ekde tiam, turnante sin al diligenta varbado kaj verkado. En tiu tempo kreiĝis apartaj esperantistaj simboloj: la verda koloro kaj kvinpinta stelo, komune akceptitaj jam komence de 1895. Esperanto sukcese trapasis sian unuan gravan krizon, kaj ankoraŭ longan tempon poste ĉiuj provoj formi internacian organizaĵon el individuoj renkontis fortan reziston, ĉar oni memoris la malfeliĉan kombinon de du kontraŭaj celoj, propagando kaj reformado, kiajn fiksis la Ligo. Zamenhof memoris en 1908: „De la tempo, kiam la Esperantistoj ĉesis paroli pri reformoj, komenciĝis por Esperanto periodo ĉiam pli kaj pli brilanta."

Kelkaj el la organizemaj eksvolapukistoj forlasis Esperanton, kaj la esperantistoj ekpaŝis sur alia vojo, sin organizante laŭteritorie

kaj anstataŭigante la mankantan internacian ligilon per pli forta apogo al idealismo. En januaro 1892 oni estis notinta 1.500 enskribitajn esperantistojn, taksante la nombron de lernintoj je 15-20.000. La komunan spiriton forĝis literaturaj verkoj kaj la gazetoj. Kiam *La Esperantisto* malaperis meze de 1895, ĉar sekve de artikolo de Tolstoj ĝi ne plu povis penetri Ruslandon, kie troviĝis la plej multaj abonantoj, ĝian rolon transprenis — fine de 1895 — la revuo *Lingvo Internacia* en Uppsala, kiu disponigis valoran materialon por la pliriĉigo kaj studado de la jam vivanta Esperanto.

Sed *Lingvo Internacia*, same kiel pli frue *La Esperantisto*, tute ne atingis la eksteran publikon. Efektive, ĝis la fino de la 19-a jarcento Esperanto restis esotera lingvo de apenaŭ rimarkebla grupeto de poeziemaj idealistoj. Nova erao, la t.n. franca aŭ propaganda periodo, kiu sekvis la slav-germanan kun ĝiaj pacifismaj kaj religiaj trajtoj, komenciĝis kun la sursceniĝo de la misterplena Louis de Beaufront.

14.2.2 Franca aŭ Propaganda Periodo

De Beaufront, kies vera nomo estis Louis Chevreux (1855-1935), tre verŝajne la unua franca esperantisto, savis Esperanton el plena izoliĝo, kiu minacis ĝin pro ĝia limigita lingva kaj idea rolo. Li fariĝis la unua celkonscia propagandisto, enkondukante metodojn de sistema reklamado kaj zorge klopodante eviti identigon de la lingvo kun pacifismo. La Societo por la Propagando de Esperanto — formale internacia, kun individuaj membroj — kiun li fondis en januaro 1898, al kiu aliĝis preskaŭ ĉiuj gravaj eksterlandaj esperantistoj kaj kies dulingva organo *L'Espérantiste* populariĝis ankaŭ en la publiko — tiu Societo servis kiel modelo por ĉiuj alilandaj societoj, kiuj fondiĝis rapide unu post alia. Anstataŭ senĉese prikanti la spiriton de Esperanto, kiel plaĉis al la poetoj, De Beaufront „kodifikis Esperanton" (K. Bein), konsilis pri korekta lingvouzo, kondamnis reformemon, ridindigis kritikantojn kaj — kreante la sistemon de patronado — ornamis sian Societon per la nomoj de eminentuloj. La revuo iĝis organo samtempe propaganda kaj konservativa. Sed kvankam la rapida kresko de la Movado dum la franca periodo estas nedisigeble ligita al De Beaufront, baldaŭ rimarkiĝis ankaŭ negativaj sekvoj de lia agado kiel organizanta kaj legdonanta estro, kiu en preskaŭ monopola pozicio gvidis la esperantistojn, elvokis ĉe ili senton pri eliteco kaj emon troigi kaj fanfaroni, kolektis — en la kategorio de „aprobantoj" — amason da homoj neniam funde lernintaj la lingvon kaj kiu paralizis iniciatemon. Malaperis la antaŭe ne maloftaj voĉoj de dubo kaj mal-

espero, cedante sian lokon al optimistaj certigoj. Aldone al tio komenciĝis eksterproporcia personkulto ĉirkaŭ Zamenhof — „Nia Majstro" — kaj el la etburĝoj, kun sia tipa individuismo, kiuj aliĝis nun al la Movado, „multaj kompletigis per Esperanto sian kolekton da manioj, spiritismo, kontraŭalkoholismo, seksabstinemo, kontraŭvivisekciismo" (Waringhien).

Sed komence de la nuna jarcento Esperanto trovis eniron ankaŭ en superajn tavolojn. Dank' al iniciato de la matematikisto Carlo Bourlet (1866-1913), en aŭgusto 1901 estis subskribita kontrakto inter la renoma eldonejo Hachette (Parizo) kaj De Beaufront, kiel „garantiulo" de Zamenhof, pri eldonado de Esperantaj gramatikoj kaj vortaroj. Kiam De Beaufront intencis transpaŝi la francan merkaton, leviĝis unuaj suspektoj, kiujn nutris Bourlet, kaj la esperantistoj, eĉ se ili ŝatis pli esti gvidataj ol mem organiziĝi, disvolvis instinktan opozicion kontraŭ ies persona monopolo — ne nur kontraŭ Hachette, sed fine ankaŭ kontraŭ De Beaufront. Kiam komence de 1903 efektiviĝis, refoje sub influo de Bourlet, nova kontrakto, nun senpere inter Hachette kaj Zamenhof, la stelo de De Beaufront komencis defali, ne ĉar lia laboro malsukcesis, sed ĉar atendis homoj pli elstaraj por rikolti ĝiajn fruktojn.

La monopolan rolon de De Beaufront sekvis la arda konkuro de tri gvidantoj: Generalo Hippolyte Sebert (1839-1930), monda aŭtoritato pri balistiko, kiu elpensis vastajn, finance subtenatajn, organizajn planojn; Bourlet, la propagandisto per komercaj eldonentreprenoj; kaj Théophile Cart (1855-1931), rigora defendanto de la lingva netuŝebleco kaj kontraŭulo de internacia organizo de la esperantistoj — homo, por kiu ekzistis „nur unu realaĵo, la lingva instinkto de la amaso, ĉiam sekvinda, eĉ se erara" (Waringhien). Ankoraŭ tute izolita estis la grupo de tiuj (Michaux, Hodler k.a.), kiuj celis al demokrata organiziĝo. Ĉiuj ĉi tri homoj ne estis pli (aŭ malpli) idealistaj ol De Beaufront, sed por forpuŝi lin ili lerte eluzis la inklinon de la esperantistaro al „interna ideo"; celante sekurigi sian influon, ili toleris aŭ favoris la floradon de la Majstrokulto kaj de Esperantismo kun flagoj, steloj kaj verda koloro. Ĉar temis pri taktika ekspluato de sentimentoj, ĉia provo de Zamenhof (kaj de aliaj) difini la idean enhavon de Esperanto aŭ eĉ starigi propran doktrinon estis samtempe kontraŭbatalata per ĉiuj fortoj.

14.2.3 La Unua UK (1905) kaj la Deklaracio de Bulonjo

Zamenhof mem restis fidela al sia gvida ideo, ke la progresigo de Esperanto ne devas esti ligita al unu persono, sed al „institucio,

libere elektata de la esperantistaro mem". Inter multaj projektoj de organizo, kiuj troviĝis en la tagordo de la Unua Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer (1905), estis ankaŭ lia de Tutmonda Ligo Esperantista, gvidata de dudekkvin-persona Centra Komitato kaj konsistanta el specialaj komitatoj agada, lingva, kongresa, cenzurista kaj ekzamena. La parizaj eminentuloj reagis tiel, kiel diktis al ili la malfido je la planoj de la respektiva konkuranto. Ĉiu timis, ke la alia ekregos la Esperanto-Movadon. Ligante la demandon pri fondo de Ligo kun la aferoj de Hachette, Cart disvastigis la onidiron, ke Zamenhof estas katenita al tiu eldonejo kaj ke la projekton („kaŝita glavo, kiu minacas Esperanton") oni trudis al li por monopoligi la lingvon „kvazaŭ petrolon aŭ kotonon". Ankoraŭ pli fortan kontraŭstaron ol liaj ideoj pri demokrata internacia organizaĵo renkontis la sinkretismaj konceptoj de Zamenhof, tiel ke nur pene li sukcesis voĉlegi sian — cenzuritan — *Preĝo sub la Verda Standardo* kaj kontentiĝis demandi la kongreson, ĉu ĝi „trovas organizacion dezirinda aŭ ne".

Magraj do estis la rezultoj de la Unua Kongreso, kiam temis pri la organiza problemo. Tamen, ĝi markis la eniron en internacian periodon, unuafoje demonstris parolan uzon de la lingvo inter diversnacianoj („homoj kun homoj") kaj multe kreskigis la entuziasmon. Kreiĝis Lingva Komitato, elektita de Zamenhof kaj konfirmita per voĉdono de la kongresanoj, kaj la kongresa estraro estis komisiita organizi ankaŭ la venontan kongreson (en Ĝenevo).

Ĉar la malferma parolado de Zamenhof komprenigis, ke la interna ideo estu io pli ol ia nedifinebla mistiko kaj poresperanta instigilo, kio kaŭzis grandan suspektemon ĉe la francaj raciistoj, kaj ĉar aliflanke necesis kontraŭagi la vaste regantan antipation al la rolo de Hachette, la Kongreso akceptis oficialan difinon de la Esperanto-Movado, la faman Deklaracion pri Esperantismo, kiu nete distingas inter ĉiu ajn „alia ideo aŭ espero" kaj la oficiala Esperantismo kaj konfirmas la neligiĝon de Esperanto al iu persona leĝdonanto. Ĝi restis valida ĝis hodiaŭ:

> Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso Esperantista en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon:
> 1. La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu „ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn", donus al la homoj de malsamaj nacioj, la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj insti-

tucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure *privata*, por kiu la Esperantismo ne respondas.

2. Ĉar en la nuna tempo neniu esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke lingvo internacia povas esti nur lingvo *arta*, kaj ĉar el ĉiuj multegaj provoj, faritaj en la daŭro de la lastaj centjaroj, ĉiuj prezentas nur teoriajn projektojn, kaj lingvo efektive finita, ĉiuflanke elprovita, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj pleje taŭga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto, tial la amikoj de la ideo de lingvo internacia, konsciante ke teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam de longe ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo *Esperanto* kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo *.

3. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas „nenies proprajo", nek en rilato materiala, nek en rilato morala.

Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj; kiel spiritaj mastroj de tiu ĉi lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.

4. Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute *privatan* kaj por neniu devigan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo „Fundamento de Esperanto", en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj „tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto". Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la „Fundamento de Esperanto", ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon

* Tie ĉi, la originala projektita teksto daŭrigis tiel:
„Sed se kontraŭ ĉiu atendo iam montriĝus, ke per ia alia vojo la ideo de lingvo internacia povos esti realigita pli bone, pli certe kaj pli rapide, ol per Esperanto, tiam la aŭtoro de Esperanto aliĝos al tiu nova vojo kaj kune kun li espereble ankaŭ ĉiuj esperantistoj".

Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva Societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.

Por tuj doni sekvon al punkto 3, Zamenhof deklaris, ke li ĉesigos eldoni ĉe Hachette la Kolekton Aprobitan kaj ke estonte li aperigos tie nur siajn proprajn verkojn. Malgraŭ peto de Leo Belmont, ke la Deklaracio aludu pri la servoj de Esperanto al paco, restis en ĝi nur atentigo pri la ebla paciga influo de la lingvo interne de multnaciaj ŝtatoj. Fine, Cart atingis, ke la teksto ne entenu promeson, proponitan de Zamenhof, laŭ kiu la esperantistoj aliĝus al tiu lingvo, kiun „ia aŭtoritata internacia kongreso" definitive elektis lingvo internacia.

Depost Bulonjo ĉiujare okazis la Universalaj Kongresoj en atmosfero de senlima entuziasmo, kompletigata per kantado de la Himno kaj admira aŭskultado al la vortoj de la „Majstro". Tiaj trajtoj apenaŭ bremsis la efikon de la propagando. Ofte ili certigis ĝin, enblovante en la varbitojn amon al la „Afero", sen kio sindediĉa laboro ne estas imagebla. Samtempe plimultiĝis la ebloj de praktika utiligado de la lingvo, ne nur por diversaj flankokupoj, sed iom post iom — kvankam en limigita kadro — ankaŭ en komerco kaj industrio. Sekvis el tio jam en 1907 la fondo de Ĉekbanko Esperantista kun sia monunuo spesmilo.

La organizan vakon klopodis iel plenigi Generalo Sebert, je tio konsekvence subtenata de Zamenhof. Tuj post la Bulonja Kongreso li transformis la estraron de la kongresaj kunsidoj en Organizan Komitaton, paralelan al la Lingva, por kiuj ambaŭ ekfunkciis Esperantista Centra Oficejo (CO) en Parizo. Ĝi estis pure privata kaj nur teknika sekretariejo, finance vivtenata de Sebert kaj lia amiko Javal kaj neniel rajtigita de kongresa decido aŭ de la naciaj societoj. Pro la ĝenerala oponemo al kia ajn anonima aŭtoritato, Zamenhof precizigis, ke la CO „volas ne direkti kaj regi, sed nur *informi* kaj *servi*". Tiun taskon ĝi bone plenumis dum kelkaj jaroj: Sebert fondis la Esperantistan Dokumentaron, regule eldonis raportojn kaj protokolojn kaj lanĉis (en 1908) la Oficialan Gazeton Esperantistan. Laŭ statistiko de la CO, en 1906 estis 434 registritaj societoj, kaj tiu nombro rapide kreskis: 756 fine de 1907 kaj 1.266 en 1908.

La Dua Kongreso en Ĝenevo, kun pli ol 800 partoprenantoj, jam troviĝis tute sub la influo de Sebert. Komenciĝis tie la impona defilado de diversnaciaj salutantoj en la inaŭguro, oni akceptis Deklaracion pri la Neŭtraleco de la Kongresoj (kies „programo ne devas permesi la diskuton de politikaj, religiaj kaj socialaj demandoj"); la Provizora Lingva Komitato fariĝis definitiva; kaj la Provizora Organiza Komitato transformiĝis en Konstantan Kongresan Komitaton (KKK).



Louis de Beaufront (1855-1935): Grandaj meritoj kaj kulpoj, – la mistero restas.
Malsupre: Carlo Bourlet (1866-1913): La batalo ĉe Hachette.



Hippolyte Sebert (1839-1930): Balistikaj planoj pri sukceso.





Emile Boirac (1851-1917): Energia kontraŭstaro al la idistoj.

14.2.4 Ido-Skismo kaj Stabiliĝo de Esperanto

Sed pli kaj pli da homoj sentis, ke Esperanto malproksimiĝus de la reale pensanta mondo, se ĝi ne estus simple kaj klare organizita kaj ne servus al internacia praktikado. Komprenante tiun bezonon, la Franco Alphonse Carles proponis nomi „en multaj urboj konsulojn, al kiuj oni povus ĉiam sukcese sin turni kaj de kiuj — per malgranda maklera pago — oni povus ricevi ĉiujn petitajn sciigojn, eĉ privatajn informojn pri komercistoj". Anstataŭ Tutmonda Ligo Esperantista, laŭ li, „sufiĉus krei centran konsulejon". La Kongreso principe aprobis la ideon, rekomendante al la lokaj grupoj fondi tiajn esperantistajn konsulejojn, sed oni tute malatentis, ke por tio necesus speciala organiza centro. Por internacia organiziĝo sur kvazaŭ-parlamenta bazo senlace batalis la estro de la bulonja grupo, Alfred Michaux (1859-1937), kaj Zamenhof konfirmis fine de 1907, ke organizaĵon por la esperantistaro li daŭre opinias necesa, sed ke pro la obstina opono de Cart kaj De Beaufront li ne volas nun enmiksiĝi en la diskutojn.

Ĉar tiuj plue kondukis al nenia konkreta rezulto, Zamenhof, ĉiam sopirante demeti respondecon de siaj ŝultroj, dediĉis sian atenton denove al eksteraj instancoj por ricevi internacian apogon al Esperanto. Kelkaj favoraj antaŭkondiĉoj ekzistis: Kun la nova jarcento komenciĝis por Esperanto periodo de publika atento, scienculoj interesiĝis pri ĝi, kaj dum la Pariza Ekspozicio (1900) sciencaj kongresoj diskutis pri la mondlingva problemo. Tamen, mankis prestiĝa internacia organizaĵo, al kiu oni povus sin turni, kaj tial Esperanto falis en la manojn de t.n. Delegacio por alpreno de lingvo internacia, kiu estis nur provo de internacia konferenco kaj ne havis ian memstaran socie gravan rolon. Iniciatis ĝin en 1900 la francaj profesoroj Louis Couturat kaj Léopold Leau; aliĝis al ĝi pli ol 300 societoj kaj pli ol 1.000 sciencistoj, kaj plej vigle subtenis ĝian programon la esperantistoj. Post kiam Internacia Asocio de l'Akademioj, petita ekzameni, deklaris sin nekompetenta decidi pri problemo „solvota de la vivo mem", Couturat kaj Leau formis en oktobro 1907 dekdumembran Komitaton (i.a. kun la lingvistoj Jespersen, Schuchardt, Baudouin de Courtenay kaj la kemiisto Ostwald) por mem pristudi la problemon. Kvankam Zamenhof avertis, ke la Komitato ne „havos ian aŭtoritaton en la okuloj de la mondo", De Beaufront promesis al Couturat sian subtenon, eble kredante per tio reakiri gvidan rolon en la Movado, kaj partoprenis la kunsidojn kiel komisiito de Zamenhof. La Komitato rekonis la kvalitojn kaj praktikajn servojn de Esperanto, sed samtempe deklaris, ke iuj reformoj necesas. Couturat submetis projekton de „Ido", kiu konsideris la proponitajn ŝanĝojn en la strukturo, gramatiko kaj vortaro de Esperanto kaj estis — je la konsterniĝo de la esperantistoj — defendata de De Beaufront,

antaŭe parolinta favore al Esperanto. Fine, la Komitato decidis „alpreni principe Esperanton" kondiĉe de iuj ŝanĝoj kaj intertrakti kun la Lingva Komitato pri la eventualaj modifoj.

En la baldaŭ naskiĝonta akra polemiko ambaŭ partioj, Couturat kaj De Beaufront unuflanke, Cart kaj Bourlet aliflanke, malmulte zorgis pri scienca rezonado. La du unuaj tute preteratentis la socian flankon de la demando — De Beaufront neniam komprenis la kolektivan uzon de Esperanto, kaj Couturat emis ignori la esperantistojn, fidante ke tiu inerta amaso sekvos la decidojn de siaj gvidantoj —, dum Cart kaj Bourlet konsideris ĉian kompromison malutila kaj danĝera. Pro la agitado de Cart, Couturat preferis rompi la rilatojn kun la Lingva Komitato, antaŭ ol atendi ĝian decidon pri la rekomendoj de la Delegacio, troviĝante per tio en silenta akordo kun la deziroj de Cart kaj Bourlet, kiuj timis la repacigan influon de Zamenhof.

En januaro 1908 evidentiĝis, ke la Lingva Komitato estas kontraŭ plua traktado kun la Delegacio, sed Zamenhof ankoraŭ volis eviti publikan militon. Pro tio, tamen, ke dume kreskis inter la esperantistoj maltrankvilo kaj indigno pri la reforma diskuto, li fine estis devigita anonci la ĉesigon de la rilatoj kun la Delegacio.

Tute sendepende de la starpunktoj de la gvidaj personecoj, la esperantistaro elmontris sian potencon. Tiun lingvon, kiun ili sukcese praktikis kaj al kiu ili dediĉis la plezuron de sia libera tempo, kiu elproviĝis en sia nuna formo kiel taŭga komunikilo dum renkontiĝoj, en kiu aperadis libroj kaj gazetoj, kiu utilis por praktikaj celoj, kiu posedis eĉ propran valuton — tiun sian Esperanton ili gardis kiel sanktaĵon kontraŭ la aroga interveno de eksteruloj. Esperanto pruvis dum tiu krizo, ke „el artefarita lingvo ĝi trapasis en formon de viva lingvo" (Jirkov) kaj forte enradikiĝis en homa kolektivo, kiu komprenis la neceson de „severa disciplino" kaj „absoluta unueco", laŭ Zamenhof antaŭkondiĉoj por la progresigo de la lingvo, kaj kiu, aldone al tio, estis gvidata de naiva, sed utila idealismo, kovronta la estiĝon kaj verajn kialojn de la krizo sub densa vualo de silento.

De tiam ĉia diskuto pri reformoj fariĝis tabuo. Cart lanĉis la sloganon „Ni fosu nian sulkon!" por instigi al celkonscia laboro nedeflankiĝanta. Kiam De Beaufront malkaŝis en majo 1908, ke Ido estas lia verko, tio, kompreneble, kaŭzis grandan indignon [1]. La agresemo, kiu fontis el malkontento pro la ĝenerala stato de la Movado, sin direktis ĝuste kontraŭ la pli fruan majstron de propagando, al kiu tre multaj esperantistoj ŝuldis sian lingvoscion.

1. Fakte, laŭ esplor-rezultoj de Ric Berger publikigitaj en 1937, Ido estis unuavice la verko de Couturat mem.

14.3 MONDAJ ORGANIZAĴOJ (1908-1947)

14.3.1 Fondo de Universala Esperanto-Asocio

Infano de la krizo de 1907/08, kiu multe pli ol lingvan skismon kaŭzis fendon inter parto de la gvidantoj kaj la amaso (el la unuaj 20% transiris al Ido, el la „simplaj" esperantistoj nur 3-4%), estas Universala Esperanto-Asocio. Ĝis 1908 la solaj internaciaj ligoj estis la ĉiujara adresaro de novaj esperantistoj de Zamenhof (ĝis 1903), poste la Tutmonda Jarlibro Esperantista (1904-10) de Félicien Menu de Ménil (la komponinto de la Himno) kaj la Centra Oficejo, kiu ne kapablis generi internacian organizaĵojn. Sebert kaj Zamenhof senlace serĉis pli solidan bazon por la CO, ĉu per societo de subtenantoj ĉu per Administra Komitato financata de la naciaj societoj, sed pro la konstanta obstrukco de Cart al ĉia formo de internacia organiziĝo la Kongreso en Barcelono (1909) povis voĉdoni nur ĝeneralan dezir-esprimon, ke la diverslandaj societoj kreu Internacian Konsilantaron por zorgi pri la financaj rimedoj de LK kaj KKK.

Sendepende de tiuj vanaj diskutoj kreiĝis UEA, kiel rezulto de junula iniciato kontraŭ la ekzistantaj organizitaj formoj. Ĝi estas unuavice la verko de 21-jara Sviso, Hector Hodler, kiu, dumtempe ankaŭ pensinte pri organizo de la tuta esperantistaro, limigis sian ambicion al pli malvasta, sed tute demokrata societo, simpla, servo-preta kaj malmultekosta. Baziĝante sur la ideoj de Carles, kiuj estis jam realigitaj, sed malhavis ian koordinon, la Asocio dividis sian laboron en tri fakojn: Administrado, Esperanto-konsuloj kaj -oficejoj, Turismo. Post la oficiala fondiĝo, la 28-an de aprilo 1908, la nova organizaĵo fiksis en Statuto siajn celojn:

(a) La celo de la Asocio estas la plifaciligo de ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligilo de solidareco inter la membroj.
(b) UEA estas neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco.
(c) La sola oficiala lingvo estas Esperanto, tia, kia, ĝi estas difinita per sia literatura kaj teknika vortaro.
(d) La membroj estas individuaj, t.e. la membro rekte aliĝas al la Asocio, kaj ne pere de sia loka grupo aŭ landa societo.
(e) En la lokoj, kie por tio ekzistas ebleco, unu el la membroj estas delegito (lia adreso aperas en la Jarlibro) kaj li libervole plenumas diversajn praktikajn servojn por la membroj, kiuj sin turnas al li.

Tiuj principoj restis, kun malgrandaj modifoj, la fundamentaj principoj de UEA ĝis la hodiaŭa tago. La solan escepton parte faras la principo menciita sub (d), kiel oni vidos en Ĉapitro 18.

La fondo de UEA savis la esperantistojn el teoriaĵoj kaj inaŭguris

novan periodon, tiun de efektiva uzado de la lingvo. La sistemon de Konsuloj UEA anstataŭigis per delegita reto kaj per eldono de Jarlibro kun adresaro laŭ alfabeta listo de urboj. Tiu tempo, kiam oni zorgis ekskluzive pri propagando, estis finita, kaj Hodler mokis pri la kategorio de aprobantoj, kiuj ne sciis la lingvon, kaj pri la uzo de nacia lingvo en grupkunvenoj. La sukceso de UEA pravigis la vojon de Hodler: jam en aŭgusto 1908 la Asocio havis 200 delegitojn, 80 vicdelegitojn, 100 subdelegitojn kaj 1.300 pagantajn membrojn. Starante ekster la senmovaj oficialaj institucioj, kiuj siaflanke nur modere aklamis al tiu junula iniciato, UEA diferencigis inter esperantisto laŭ la Bulonja Deklaracio kaj esperantiano, la membro de UEA, kiu en „Esperantio" vidu modelon de estonta homaro internacie solidara kaj kunlaborema.

Pri kio Zamenhof malsukcesis, por kio la „interna ideo" ĉiam restis nesufiĉa — tion atingis Hodler: doni al la Movado ideologian karakteron. Batalante unue por demokratigo interne de la Movado, kontraŭ oligarkaj tendencoj kaj komercaj monopoloj, li rifuzis taksi la mondlingvan problemon sendepende de aliaj sociaj problemoj, ĉar „ni ne devas ĝin izoligi for de la ekstera mondo". Esperantismo estis por li — diference de pure lingva movado — „precipe socia, konstrua kaj progresema movado". Por plibonigi la interpopolajn rilatojn, la „praktika internaciismo" de UEA povus alporti pli konkretajn rezultojn „ol tiuj homoj, kiuj konstante parolas pri frateco inter la popoloj, kaj neniam faris ian seriozan klopodon por eĉ parte efektivigi siajn ideojn en la reala vivo". Kontraŭe al la tradiciaj internaciismo kaj pacifismo, kiuj „celas nur plifaciligi la rilatojn inter la *naciojn*", sed „nenion kreas *super* ili", la esperantismo devas esti avangardo en nova, pozitiva fazo de internaciismo, kunigante *homojn* kaj ignorante naciecon, lingvon kaj rason. „Liveri al tiuj homoj neŭtralan organizaĵon dank' al kiu ili povos plimultigi siajn interrilatojn, sin reciproke alservadi, kunigi sian penadon por komuna agado ĉiam pli kaj pli interkonatiĝi; kreskigi inter ili ĉiam pli profundan senton de solidareco; instrui ilin tiel, ke ili juĝu ne laŭ pure nacia vidpunkto, sed laŭ neŭtrale homa, eksternacia kriterio; fine edukadi la popolamasojn, ne per propagando, sed per kreado de materialaj, palpeblaj servoj, tiel ke la plej humila homo, kun la tempo, konsciu pri la grava instruo de internaciismo, kiu elŝprucas el tio, jen la tasko de Universala Esperanto-Asocio."

En la Kvara Kongreso en Dresdeno (1908), la unua sub registara protekto, UEA kunvokis siajn anojn, al kiuj Zamenhof, komence iom dubema pri la entrepreno, adresis kuraĝigajn vortojn kaj la certigon, „ke UEA estas la plej grava institucio de Esperantismo". Kaj komprenemo por la apartaj celoj de Hodler tralumis en lia salutparolado

al la UEA-kunveno en Barcelono: „U.E.A. unuigas do ne ĉiujn esperantistojn, sed ĉiujn esperantismanojn, t.e. ĉiujn tiujn homojn, kiuj konsideras ne nur Esperanton en ĝia ekstera lingva formo, sed ankaŭ ĝian internan ideon." En 1910 UEA havis sian unuan, kaj solan memstaran, Kongreson en Augsburg, en 1911/12 ĝi organizis efikan prelegvojaĝon de sia usona membro Parrish tra Eŭropo, la membraro kreskis ĝis 1914 al pli ol 7.000 kaj inter 1909-13 estis plenumitaj 45.000 praktikaj servoj.

Sed UEA ankoraŭ ne estis la delonge projektata oficiala organizaĵo. Dum la ĉefajn Esperanto-manifestaciojn karakterizis optimismaj paroloj, apelado al la interna ideo kaj florludoj, kio tre plaĉis al la plimulto de la kongresanoj, iom post iom kreskis la praktika uzo de la lingvo — aperis gvidfolioj, firmoj ekuzis Esperanton, kaj internaciaj kongresoj voĉdonis favore —, kio pli kaj pli malfaciligis la intencon konservi la ĝisnunan, nedemokratan gvidadon de la Movado. Dubindan rolon ŝajnis havi propono transformi la kongresojn en aŭtoritatajn reprezentantarojn de la esperantistoj, ĉar la homoj venis tien hazarde kaj rajtigitaj delegitoj ne povis kalkuli pri subvencioj de lokaj grupoj.

14.3.2 Pliaj Organizaj Bataloj

En la organiza batalo, kiu atingis sian kulminon inter 1911 kaj 1913 kaj kiun la esperantistoj nun akompanis per vigla interesiĝo, agadis tri ĉefaj partioj: unue, Bourlet kaj Sebert, kiuj celis reguligitan organizon de la esperantistoj per elekto de kongresaj delegitoj kaj per federaciigo de la naciaj societoj; due, Cart, kredanta centran aŭtoritaton pri lingvaj aferoj plene sufiĉa ; kaj trie la fondintoj de UEA, kiuj povis montri al sia Asocio kiel taŭga bazo de demokrata organizaĵo. Zamenhof deziris nur ian laŭleĝecon, kiu forprenus de li la ĉiam pli preman respondecon. Laŭ lia propono, antaŭ la Sepa Kongreso en Antverpeno (1911) la propagandaj societoj kaj grupoj — kun entute 26.000 membroj — elektis delegitojn, kiuj havis voĉdonan rajton dum la Kongreso. Post longaj, pasiaj diskutoj pri la centra organizo, estis elektita dekok-membra komisiono por studi la organizan problemon, ellabori projekton kaj prezenti ĝin al la Oka Kongreso.

Kiam Cart malkaŝe bojkotis la Rajtigitan Delegitaron, denove kredigante ke ĝi estis altrudita al Zamenhof, tiu ĉi definitive satiĝis je siaj provoj influi la organizan diskuton kaj publike demetis (en Krakovo) sian rolon kiel ĉefo de la Movado, anoncante ke de nun li konsideras sin simpla esperantisto. Tiu retiriĝo efektive ne estis tre surpriza, ĉar ĝi iom spektakle konfirmis la tutan ĝistiaman volon

kaj rolon de la iniciatoro, kontraŭdezire nomata „Majstro". Zamenhof decidiĝis al tiu paŝo, ĉar pro la ofte akraj diskutoj inter la gvidantoj li vidis endanĝerigata sian bazan kredaron, kiun li iom malantaŭenŝovis, dum la lingvo ankoraŭ estis en sia junaĝo, sed kiu nun minacis fali en forgeson meze de la organizaj diskutoj. Li komprenis, ke ĉiu partio deziras lian ĉefecon nur tiam, kiam li subtenas ĝian agadon. Jam en Ĝenevo Zamenhof rifuzis prisilenti verojn nur pro la supozata bono de Esperanto: „Senkolora oficiala parolado estus granda peko de mia flanko. Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas pro libereco, *pro la plej elementa homa libereco, pro la rajtoj de homo.*"

Pluevoluigante, tamen en pli larĝa kadro, ideojn, kiujn li esprimis en la libro *Hilelismo. Projekto pri Solvo de la Hebrea Demando,* ruslingve aperinta en 1901 en Peterburgo[2], Zamenhof disvolvis, kiel privatulo, per la broŝuroj *Dogmoj de Hilelismo* (1906), *Homaranismo* (1906) kaj *Deklaracio pri Homaranismo* (1913) siajn sugestojn pri la intergenta kaj interreligia alproksimiĝo de bonvolaj homoj — ne idean akcesoraĵon de la lingvo, sed vojon al internacia paco, kiu estu plene bazita sur Esperanto, sed ne deviga por la esperantistoj[3]. Ke la Esperanto-Movado ne povos oficiale identiĝi kun tiu nova doktrino, tion li ĉiam koncedis, sed ke Esperanto ekskluzive servu nur al praktikaj bezonoj, ke la esperantistoj dum siaj kongresoj parolu nur pri siaj propraj lingvaj kaj organizaj problemoj kaj reciproke sin entuziasmigu, tio akre malakordis kun liaj imagoj. La patosan eldiron en Ĝenevo, ke la „kongresoj ne forgesu sian plej profundan taskon, tio estas kulturi la flamon de homara sindono kaj espero", li ripetis en pli sobra tono dum la inaŭgura parolado en Cambridge: „... ĉio, kio, neniun ofendante, povas krei pacan *ponton* inter la popoloj, tio ne sole ne devas esti timeme evitata en niaj kongresoj, sed kontraŭe ĝi devas esti ĝuste la *esenco* de niaj kongresoj..." Ne prenante partipolitikan starpunkton, la kongresoj tamen kunhelpu organizi la internacian vivon de la homaro. Sed kion Zamenhof difinis nur kiel rimedon por atingi la celon, tio fariĝis por multaj esperantistoj celo per si mem kaj enhavo de ilia tuta agado: La neŭtrala fundamento de la ling-

2. Fotorepreso de tiu rara verko aperis, kune kun Esperanta traduko de Adolf Holzhaus, en Helsinki, 1972.
3. Por pli detala informiĝo pri la mondkoncepto de Zamenhof oni konsultu interalie jenajn artikolojn: G. Waringhien, „La ideologia dramo de L. L. Zamenhof", *Sennacieca Revuo,* 1953, n-ro 81, p. 2-9; A. Caubel, „Nekonato: la Zamenhofa Homaranismo", sama revuo, 1959, n-ro 87, p. 3-17; N. Z. Maimon, „Historio de Hilelismo", *La Nica Literatura Revuo,* vol. 5, 1959/60, p. 136-140, 163-171.

vo, „sur kiu la diversaj homaj gentoj povus pace kaj frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn", estis komprenata kiel neŭtrala esenco de la Esperanto-Movado, iĝante fine same sankta kiel la interna ideo, kies interpreton kaj praktikan disvolvon ĝuste malhelpis tiu absoluta neŭtralismo.

La postaj jaroj konfirmis la timojn de Zamenhof: Krakovo denove prokrastis la decidon pri solvo de ĝenerala organizo ĝis la venonta Kongreso, kaj kiam en Bern (1913) oni proponis la starigon de Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Societoj, kiel nura federacio, kun la CO kiel sidejo, la tempospaco ĝis la militeksplodo ne plu permesis ĝin vivigi.

Tiu Naŭa Kongreso (la Kvara de UEA) vidis ankaŭ la unuan provon pli konkrete difini la ideologian pozicion de la UEA-anoj, nome ilian sintenon en la demando pri milito kaj paco. La vicprezidanto de UEA, Théophile Rousseau (1876-1916), prezentis bone pesitan raporton pri „UEA kaj Ŝovinismo", kiu ne alvokis al senkondiĉa militrifuzo aŭ pacifismo, sed klare postulis, ke „esperantiano" ne nur ne povas esti ŝovinisto, sed devas rebati, surbaze de informoj akireblaj per la delegita reto, „la mensogojn disportitajn de la ŝovinista gazetaro", kaj ke oni ne facilanime fidu fremdulojn nur pro ilia esperantisteco. Pri tiaj vojmontraj ideoj, kiuj transiris tiun temaron, kiu kutime plenŝtopis dumkongresajn diskutojn, la kunveno apenaŭ havis komprenemon — oni demandis, „ĉu la milito ne estas necesa", kaj pluraj insiste petis, „ke oni ne okupu sin pri politikaj aferoj", tiel ke fine la konkludoj de Rousseau akceptiĝis nur en tre akvumita formo. Eĉ pli: almenaŭ unu nacia societo deklaris sin eksplicite kontraŭ eksigo de ŝovinistoj kaj rigardis la gvidantojn de UEA sur „danĝera vojo".

Samkiel la francaj eminentuloj en 1905 konsterniĝis pro la *Preĝo sub la Verda Standardo* de Zamenhof, tiu „juda profeto", kiun, katenante al lingvaj kaj administraj temoj, ili zorge ŝirmis kontraŭ publika elpaŝo por liaj homaranismaj idealoj, tiel ankaŭ Bourlet, la organizanto de la Pariza Kongreso (okazonta en 1914, sed ne okazinta pro la milito), malebligis, sub la impreso de la ŝovinisma febro, la planon de Zamenhof organizi, paralele al la UK, Kongreson de Neŭtrale-Homa Religio. El ties unua projekto, kiu celis konstrui neŭtralan, pacigan ponton inter la diversaj religioj, ne detruante ilin, jam fariĝis ĝermo de nova religio de „homoj libere pensantaj", formo de „organizita sengenta kaj sendoktrina komunumo de liberkredanoj".

Pro la ignoremo de esperantistoj kaj neesperantistoj, tamen ankaŭ pro la nepreciza, iom eksmodiĝinta programo, la tro naivaj formu-



Hector Hodler (1887-1920): Juneca vervo kaj organiza talento; la necesa socia komplemento al la ideoj de Zamenhof.

loj kaj pro la kontrasto inter liaj revoj kaj la reala vivo, Zamenhof devis iom revizii siajn pensojn pri la neŭtraliga funkcio de unu lingvo kaj unu religio, ekkomprenante ke unu el la ĉefaj obstakloj al monda paco estas la kulto al ekstrema naciismo. Li proponis starigi *„neŭtrale-homan etikan regularon,* kiu povus fari el *homoj* homojn". Tiu pli forta akcentado de bazaj moralaj kaj politikaj principoj, kiun pli frue li jam anoncis per kompleta retiriĝo el la cionisma movado, kulminis en memorando „Gentoj kaj Lingvo Internacia" al la Kongreso de Rasoj en Londono (1911) kaj plej klare en lia „Alvoko al la Diplomatoj" (1915), en kiu Zamenhof pledis, ke „ĉiu lando morale kaj materiale plene egalrajte apartenas al ĉiuj siaj filoj", imprese montrante, ke paco venos ne per teritoriaj ŝanĝoj sed per „la detruo de la nacia ŝovinismo".

14.3.3 La Unua Mondmilito kaj la Postmilita Periodo

Fidon je paciga influo de Esperanto, se la lingvo ne estas praktikata en medio de toleremo kaj flanke de homoj jam konvinkitaj pri internaciisma idealo, Zamenhof devis perdi ĝuste sub la korŝira sperto, kiun liveris la sinteno de esperantistoj dum la Mondmilito, kiam la „interna ideo krevis kiel sapveziko" (Demidjuk): Troviĝis Francoj, Germanoj, Italoj, kiuj ne hezitis ekspluati la delegitan reton, kiun Rousseau volis utiligi por disvastigo de kontraŭŝovinismaj informoj, dissendante en la Internacia Lingvo broŝurojn kaj bultenojn por defendi la starpunktojn de la militantaj registaroj.

Zamenhof mortis en aprilo 1917, antaŭ ol li povis aŭdigi sian voĉon pri la postmilita ordo, sed Hodler komencis jam dum la milito skizi siajn imagojn pri la nova socio, kiu reorganizu la vivon en repaciĝonta mondo: UEA donis praktikan modelon de internacia solidareco per la vasta helpagado al militviktimoj ĉie en Eŭropo, kiun favoris la situo de la Centra Oficejo de UEA en neŭtrala Svislando. Hodler antaŭvidis plian kreskon de la kolektivismaj tendencoj en la postmilita mondo, pliakriĝon de la klasbatalo kaj novan rolon de Esperanto en la formiĝo de estonta ordo internacia. Li konstatis la fiaskon de ĉiuj provoj aŭtokrate starigi Esperanto-instituciojn kaj la finon de ĉiuj iluzioj, ke la registaroj akceptos la lingvon pro iaj moralaj konsideroj; profete li atentigis, ke la lingvo ne povas havi ŝancojn de ĝenerala akceptiĝo sen kelkaj bazaj antaŭkondiĉoj, t.e. ne nur armistico, sed kreiĝo de forta internaciismo. La esperantistoj estu „la embrio de tiuj elitoj", kiuj super la naciaj ruinoj konstruu novan, internacian domon. „Nacia libereco, demokratia regado, internacia ŝtatligo" estas, laŭ li, la postuloj de la nuntempo.

14.3 MONDAJ ORGANIZAĴOJ (1908-1947)

Kvankam Hodler mem ne plu povis ĝisvivi la realiĝadon de siaj ideoj, ĉar li mortis — multe tro frue — en marto 1920, la demandon pri la oficiala internacia Esperanto-organizaĵo jam decidis la dummilita evoluo, kiam, kontraŭe al la naciaj societoj, kiuj vane klopodis pri federaciiĝo, UEA sola sukcesis rezisti la naciisman ondon, establiĝante en la okuloj de la praktikemaj esperantistoj kiel reprezentanto de la tutmonda Esperanto-Movado, des pli ke post la fondiĝo de Ligo de Nacioj, kiu havigis al la Movado unuafoje ian partneron sur internacia kampo, ĉie kreskis la esperoj pri nova paca erao kaj kontentiga solvo de mondaj problemoj.

Ĉesis la pariza periodo: Hachette ne plu eldonis esperantlingvajn verkojn, kaj la Centra Oficejo, plue gvidata de Sebert, al kiu Hodler sensukcese ofertis la prezidantecon de UEA, degeneris al preskaŭ nur surpapera ekzisto, dividante tiun sorton kun Konstanta Komitato de la Kongresoj. Ĉar la naciaj propagandaj asocioj ekkonsciis pri la utilo de jam funkcianta internacia centro, UEA iom post iom, eĉ sen oficiala rajtigo fare de la Movado, plenigis la lokon de la parizaj centroj, kies influo jam ne plu sentiĝis en la Kongresoj de Hago (1920) kaj Prago (1921).

Kio unuavide estis grava bato por la unueco de la Esperanto-Movado, la apartiĝo de la laboristoj en 1921, aldone konvinkis eĉ naciistajn esperantistojn pri la neceso kunigi la fortojn de la neŭtrala Movado. El tio tamen sekvis, ke, klopodante savi la restintajn poziciojn, la posthodleraj gvidantoj de UEA, kun la rimarkinda escepto de Privat kaj kelkaj aliaj, ekipitaj per grandioza kapitalo, kiun testamentis la glora fondinto, malatentis la spiritan heredaĵon de Hodler, la unikan simbiozon de praktikismo kaj idealismo, neglektis celkonscie okupiĝi pri paca organizo de la popoloj kaj tiel ekpaŝis al negativa neŭtralismo, kiu — por gardi limlinion inter UEA kaj SAT — evitis klare ligiĝi kun internaciismaj celadoj, sed klopodis pravigi sian poresperantan aktivecon ĉe ĉiuj aŭtoritatoj, senkonsidere ĉu tio helpis fekundigi la grundon, sur kiu sola povos flori la Movado. Dum la neŭtrala Movado asertis, ke la Esperanto-organizaĵoj devas esti neŭtralaj kaj ke laboristoj povas pace kunlabori en la kadro de la neŭtralaj Esperanto-societoj, aro da aliaj, nome tiuj, kiujn allogis la idearo de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), transiris al tiu Asocio, kies strukturo kaj programo parte profitis el la impulsoj donitaj de Hodler.

Tamen, tiuj trajtoj de la internacia neŭtrala Esperanto-Movado ne estis tuj rimarkeblaj. Pli signifoplena ankoraŭ restis la organiza problemo, kiu fine ricevis kontentigan solvon dum la Universala Kongreso en Helsinki (1922). Tie estis trovita aranĝo laŭ la principoj: respekti tion kio ekzistas, kaj aldoni nur ligilon inter la du

brancoj de la Movado: unuflanke la propagandaj societoj sin adaptantaj — kelkfoje tro — al la kondicoj en sia lando, aliflanke UEA, kiu en tutmonda skalo celas praktiki kaj akceli la Internacian Lingvon, kun membraro sur individua bazo. Per la fama Kontrakto de Helsinki estis decidite, ke la naciaj societoj elektu Konstantan Reprezentantaron (KR), en kiu ĉiu societo estu reprezentita per vocdona rajto proporcia al la nombro de siaj membroj. La alia, samrajta partio estu UEA, reprezentita de sia Komitato. Ambaŭ interkonsentas pri elekto de Centra Esperanto-Komitato (poste nomata Internacia Centra Komitato, ICK), kiu konsistas el ses personoj kaj kiu „zorgas pri la ĝeneralaj interesoj de la movado", i.a. organizante la Kongresojn (depost 1924 anstataŭ KKK) kaj publikigante la Oficialan Dokumentaron. En la centran kason de ICK la naciaj societoj pagas kotizon, UEA subvencion. La prezidanto de UEA, Edmond Privat (1889—1962), samlernejano de Hodler, transprenis la prezidon de ICK; kaj Sebert tiun de KR, unu jaron poste la Anglo John Merchant (1872—1936). UEA estis do nun unu el kvar „Oficialaj Institucioj de la Movado" — apud ICK, KR kaj Lingva Komitato. La meritplena Centra Oficejo en Parizo ĉesis funkcii en 1923.

Pri koncentriĝo de la fortoj en la neŭtrala Movado intertempe jam sentiĝis urĝa bezono, ĉar ekde la fino de 1920 Ligo de Nacioj estis petita difini sian starpunkton pri Esperanto. Post favoraj rezolucioj i.a. de Unuiĝo de Internaciaj Asocioj (1920) kaj Ruĝa Kruco (1921) kreskis internaciaj rekonoj al Esperanto, dokumentitaj i.a. per raporto de Ligo de Nacioj en septembro 1922 [4]. Multaj sukcesoj ŝuldiĝis al persona interveno de Privat.

La prizorgo de la eksteraj rilatoj estis unu el la ĉefaj taskoj de ICK. Samkiel UEA, ĝi havis sian sidejon en Ĝenevo, kiun estris ĝenerala sekretario resp. direktoro. La ses anoj de ICK loĝis en diversaj landoj, interrilatis ĉefe skribe kaj kunvenis nur okaze de UK. Tie la komunaj kunsidoj de ICK, KR kaj Komitato de UEA, al kiuj post 1928 oni donis la nomon Ĝenerala Estraro, regule studis la organizajn problemojn kaj klopodis realigi la dezirojn de la ĝeneralaj kongreskunsidoj. La nova organiza formo fakte neniam restis ekster diskuto, sed ĉar ĉiuj partioj konsciis, kiel malfacile atingebla estus pli bona solvo, oni decidis lasi la organizan temaron dum Kongresoj netuŝita kaj dumtempe plibonigi la funkciadon de la ekzistantaj institucioj.

Ekde ĉ. 1925 praktike el ĉiuj landoj, kie ekzistis Esperanto-Movado — kun la grava escepto de Soveta Unio, kie aparteno al UEA

4. Vidu Ĉapitron 22.

estis malpermesita en 1923 —, oni povis pagi kotizojn al la Ĝeneva Centro. La membronombro de UEA konstante kreskis: de 6.332 en 1923 al 8.265 en 1924 kaj eĉ 9.424 en 1925 (kiam en Ĉeĥoslovakio sola troviĝis 1.147 membroj), kiun rekordon la Asocio ne plu atingis [5]; inter 1927 kaj 1930 estis iom pli ol 9.000 anoj, kaj de tiam la nombro daŭre falis.


Prezidantoj de UEA post la morto de Hodler estis du aliaj Svisoj, Eduard Stettler (1920—24, 1928—34) kaj Edmond Privat (1924—28); direktoro fariĝis en 1924 Hans Jakob. La esperoj, kiujn la postmilita mondo ligis al Ligo de Nacioj, helpis levi la reputacion de UEA, nelaste ĉar ĝia sidejo, kiel tiu de la Ligo, troviĝis en Ĝenevo.

ICK eldonis Internacian Esperanto-Servon kun novaĵoj por varbado, starigis komisionojn pri radio, gazetaro, statistiko ktp. kaj organizis specialajn prikomercajn konferencojn (1923, 1925, 1929). La turisma apliko kristaliĝis i.a. en grandajn karavanojn al la Universalaj Kongresoj, kaj ankaŭ la utiligo de Esperanto en scienco kaj diversaj fakoj progresis tute kontentige. Paralele kun la klopodoj ĉe aŭtoritatoj oni entreprenis energiajn paŝojn por rekte instrui al la lingvon al la amasoj, precipe per la diverslandaj kursoj, kiujn gvidis la sekretario de ICK, Andreo Cseh. Alia propagandisto estis la Usonano Joseph R. Scherer, kiu vojaĝis en 1930—32 kiel speciala delegito de ICK tra 41 landoj kaj faris entute 322 paroladojn.

Ne estas tamen pretervideble, ke la varbado de laboristaj esperantistoj en pluraj gravaj landoj multe superis laŭ amplekso kaj efiko tiun de la „neŭtraluloj", tiel ke ICK kaj UEA pli ofte frontis antaŭjuĝojn en reakciaj medioj, por kiuj la lingvo kaj Movado ŝajnis iel dependi de socialismo aŭ eĉ komunismo. Kelkajn monatojn antaŭ la 21-a UK en Budapeŝto (1929), kies preparojn la aŭtoritatoj subtenis nur tre ŝpareme, ICK sekve opiniis necesa forigi la suspektojn pri socia nefidindeco de la Esperanto-Movado per „Deklaracio pri Neŭtraleco":

> De kelka tempo malamikoj de Esperanto klopodas por identigi la ĝeneralan propagandon por la internacia helplingvo Esperanto kun la agado de partianoj, kiuj praktike uzas Esperanton por certaj sociaj celadoj.
>
> La Internacia Centra Komitato ... deklaras formale kaj firme, ke ĝia programo, celanta nur la enkondukon de Esperanto, estas absolute neŭtrala rilate aferojn de politiko, religio, raso aŭ socio.
>
> Ĝi insiste kontraŭstaras al tiuj malveraj asertoj, kies efiko signifas nur malhelpi la grandan progreson, rezultantan el la ĝenerala adopto de facile lernebla neŭtrala helplingvo apud la koncerna gepatra lingvo.

5. Necesas, tamen, konsideri, ke en tiu epoko praktike ne ekzistis obstakloj, por sendi kotizojn al la Oficejo de UEA en Ĝenevo.



Supre: Laborkonferenco de Konstanta Reprezentaro, Internacia Centra Komitato kaj Komitato de UEA en Locarno (1926). Ĉi tiaj konferencoj rezultis el la fama Kontrakto de Helsinki (1922) kaj ĉiujare traktis organizajn problemojn de la Movado. Malsupre: Antaŭ la konferenca salono en Locarno staras (de maldekstre): R. Kreuz, J. Dietterle, E. Privat, A. Cseh, M. Rollet-de-l'Isle, H. Jakob kaj R. Hromada.



La efiko de tiu deklaro estis preskaŭ nula, ĉar dekstruloj emis ignori teoriojn pri principa neŭtraleco de la oficiala Movado — kontraste al la popularеco, kiun ĝuis la lingvo en laboristaj medioj. Aldoniĝis, ke, post la limigitaj atingoj de Ligo de Nacioj cele al internacia paco, konsiderinde regresis fido je internaciismo.

14.3.4 Krizo kaj Degenero de UEA

UEA ekspertis gravan krizon. Ĝia origino ne estis seniluziiĝo pri la realigeblo de la celo venkigi Esperanton (en tian pesimismon miloj da fervoraj esperantistoj eĉ ne pensetis fali), sed tute aliaj kialoj. Montriĝis, ke la financa mastrumado ne plu konformis kun konservo de la vasta servaro kaj ambicia programo, ke la elspezoj daŭre kreskis, dum stagnis kaj fine senhalte falis la membronombro, tiel ke la deficito, el kiu UEA povis saviĝi eĉ ne sub la prosperaj kondiĉoj ĝis ĉ. 1930, atingis alarman dimension. En 1932, la perdoj, kiujn oni devis kovri el la heredita kapitalo de Hodler (ĉ. 150.000 svisaj frankoj), estis preskaŭ 120.000 sv.fr. Minacis bankroto.

Kiam UEA reduktis sian subvencion al ICK de 2.500 al 500 svisaj frankoj jare, la Kontrakto de Helsinki venis al surpriza morto: Dum kunveno de KR en Parizo (1932) estis decidite nuligi la Kontrakton, kaj oni elektis komisionon por ellabori novan organizan formon, kiu ebligu internacian organiziĝon de la esperantistoj pere de la naciaj societoj. Konklude estis proponita en novembro 1932 la fondo de Universala Federacio Esperantista (UFE), kiu forigus UEA, laŭ ties interpreto, kiel memstaran organizaĵon.

Dek jarojn post ŝajne kontentiga solvo, la organiza problemo denove aktualiĝis. Ĝin kaŭzis daŭgera financa situacio, sed aliaj faktoroj, eksteraj kaj internaj, ludis pli kaŝitan, sed ne malpli gravan rolon. Post la klopodoj ĉe Ligo de Nacioj kaj ĝiaj praktikaj sekvoj, post sukcesaj Cseh-kursoj kaj prelegvojaĝoj, la neŭtrala Movado komencis perdi multon de sia postmilita elano. Multaj landaj societoj troviĝis en defensivo, provante konvinki siajn registarojn pri nekontraŭnacieca celado de Esperanto, kaj emis limigi sian subtenon al ICK, kiu siaflanke sukcesis nek unuigi ĉiujn diverstendencajn esperantistojn, nek realigi fruktodonan kunlaboron kun interŝtataj organizaĵoj. Kontraŭe, kiam premoj je Ligo de Nacioj ne plu promesis tujan utilon por la Internacia Lingvo, la oficiala Movado turnis al ĝi sian dorson. Anstataŭ helpi popularigi per Esperanto la pozitivajn idealojn de la Ligo, oni fordrivis sur la ondo de malfido al internaciismo kaj pli intense direktis sian atenton al registaroj — al tiuj aŭtoritatoj do, pri kies apogo Hodler neniam havis iluziojn, antaŭ ol estos kreita fortika internacia teg-

mento super la naciaj interesoj.

Ĉar aliflanke UEA ne povis atendi subtenon de la potencoj de lingva kaj kultura imperiismo, ĝi serĉis pravigi sian propran ekziston per aparta agitado ĉe diversaj ŝtatetoj. La sola konkreta rezulto — eldonado de poŝtkartoj kun mallonga teksto i.a. en Esperanto fare de Danzig kaj Liechtenstein — estis en aplomba maniero diskonigata kiel grava atingo, kaj kiam Brazilo sekvis per simila decido, ĉi-rilata laŭdartikolo finiĝis per la certigo „Ni venkos — tamen!" — ĉio sub la devizo „Propagandu ĉiam, ĉie, ĉiel, kiam, kie kaj kiel eble!" Pri la kriza situacio en la mondo oni konsolis sin mem per la aserto, „ke seriozaj personoj, kiuj perdis la fidon al diplomatiaj metodoj por pacigi la mondon, konvinkiĝis, ke la plej bona metodo, pacigi la popolojn estas la esperantista metodo" (Stettler).

Iluzioj kaj malatento de proporcioj koincidis kun revekiĝo de la interna ideo. Tiel longe, kiel UEA volis kaj povis ekspluati pacifismon kaj internaciismon kiel sekvojn de la milito, oni malmulte parolis pri la idea flanko de Esperanto (sed, por nomi la ekzemplon de Privat, senbrue praktikis ĝin); ju pli rapide tamen komplikiĝis la interna vivo de la organizaĵoj, sekve de membrofalo, malpermesoj kaj financaj problemoj, des pli laŭtvoĉe la interna ideo estis revivigita, ĉu por kaŝi la konfliktojn inter la gvidantoj kaj reentuziasmigi la membraron (rekotizig-cele) aŭ por maski proprajn interesojn, kiuj manifestiĝis sur lingva, organiza kaj komerca kampoj. Kelkaj elmontris tiam tendencon, kvazaŭ ili disponus pri monopolo rilate la idean aspekton, kiun oni plu nomis „interna ideo" — esprimo jam establita en la unua periodo, kvankam sufiĉe netaŭga por adekvate reflekti la esencon de la koncepto, al kiu la esprimo rilatas.

Ripetiĝis la trajtoj de la antaŭmilita Movado, kiam Majstro-kulto kaj nebula ideismo servis por kamufli seriozajn disputojn. Dum la neŭtrala Movado transiris de unu krizo al alia, oni persiste apelaciis al la idealoj de Esperanto. Kiom tio efektive izolis la Movadon for de la socio en pluraj landoj, precipe en okcidenta kaj centra Eŭropo, nelaste videblis per la maniero de insultado: la atako de Stettler kontraŭ la „Faŝistoj en Parizo" — pro la decido rompi la Kontrakton de Helsinki — estis multe malpli akre sentata ol unu specifa riproĉo interesperantista: „Vi ne havas la internan ideon!"

Anakronisme aspektis tiu retiriĝo al interna ideo, ankaŭ nun neniam klare difinita [6], kiam samtempe en Eŭropo kreskadis furioza

6. Komparu Ĉap. 18.2.1.1

naciismo, kies efikoj ne preteriris la Esperanto-Movadon. Necesis ne nur pli ofte kaj pli energie rebati akuzojn, ke Esperanto implicas danĝeran internaciismon, sed kalkuli ankaŭ pri nacia sentemo en la propraj vicoj. La traktado de politiko fariĝis pli tabua ol iam antaŭe en pluraj landoj, tiel ke *Heroldo* (tiam eldonata en Germanio), kiu kutimis aperigi kronikojn pri mondaj eventoj, decidis en 1932 ĉesigi eĉ tiajn pure informajn artikolojn, „ĉar ni sentis, ke la naciemaj animoj de l'esperantistaj 'pacbatalantoj' komencis tro ekscitiĝi"; fakto estis, laŭ la redakcio, „ke inter la esperantistoj troviĝas multaj homoj treege naciemaj kaj ofte ne malpli ŝovinistaj ol la konataj ŝovinistoj mem".

Tiaj konsideroj helpis konduki al la decido de Parizo: anstataŭ supernacia UEA, kiu ne devas adaptiĝi al cirkonstancoj en iu ŝtato, restante ekster „tiuj momentaj fluoj kaj refluoj naciaj" (Privat), kaj kiu elektas delegitojn senpere en diversaj landoj, por UFE pledis precipe kelkaj fortaj landaj asocioj, nome la brita, franca, germana, itala kaj sveda, celante federaciiĝon de landaj asocioj en internacia asocio sen individua membreco kiel ĉefa bazo. Leviĝis apertaj voĉoj por kreo de specialaj naciistaj Esperanto-societoj kaj por pli forta akomodo de Esperanto al naciismo; ies propono volis ligi la movadon „al deziroj de aŭtoritateco, de gvidanto senkontrola", pledante por „forlaso de humanecaj ideoj de la 19-a jarcento". Tia kliniĝo antaŭ faktoj kaŭzis, ke la interna ideo, se entute ĝi estis agnoskata kiel idea fundamento de la lingvo, antaŭ ĉio devis ŝajnigi kontinuecon tie, kie ĝi apenaŭ plu ekzistis, ĉar la vortoj de Hodler, ke la sorto de Esperanto „estas intime ligita kun la triumfo de la movado por starigo de paca ordo internacia" kaj ke „Esperantisto, kiu deziras la konservon de l' interŝtata anarkio, estas nekonscie malamiko de Esperanto", delonge forgesiĝis. Ilin substituis oficialaj deklaroj, ke la Movado „devas taŭgi por ŝtatoj demokrataj kaj aŭtokrataj". Tio logike entenis, ke por plaĉi ankaŭ al la dua — plifortiĝanta — kategorio, la Movado plurloke estis devigita proklami sian absolutan neŭtralecon resp. indiferentecon en la lukto inter faŝismo kaj demokratio [7], rezigni pri ĉia serioza iniciato cele al interpaciĝo tutmonda kaj fuĝi al tiaj senkulpaj argumentoj, ke Esperanton oni ne kondamnu pro la juda aŭtoro, ke la stelo ne estas cionisma aŭ komunisma insigno kaj ke la malpermesoj, ekz. en Germanio, nur estas „grandioza eraro", ne neevitebla sekvo de barbara ideologio.

Malpli senkulpan argumentadon enhavis artikolo publikigita en

7. Rimarkinda escepto estis la neŭtrala Jugoslavia Esperanto-Ligo, kiu alprenis firman kontraŭfaŝisman pozicion (vidu Ĉap. 21).

Esperanto Internacia ankoraŭ en 1939: „Esperanto... estas kunmetita de judo. Ni ne timu tion konfesi. Spite de tio ĝi estas mirinda instrumento..." Tio draste ilustras la ĝeneralan spiritan mizeron de la oficiala Movado, kies gvidantoj, kun kelkaj esceptoj, dum la UK en tiuj jaroj ne kuraĝis deklari, ke Judoj estas same valora elemento de la homaro kiel anoj de aliaj rasoj aŭ religioj.

Aldone al la danĝero, kiun frontis Esperanto flanke de malamiko nepacigebla per belaj paroloj, la internacia Movado estis plue malhelpata ĉefe pro financaj malfacilaĵoj. Skismo estis provizore ŝparita per la Interkonsento de Kolonjo (1933), kiu konfirmis la reprezentan rolon de UEA kiel tutmonda organizaĵo de esperantistoj, allasante tamen pli fortan influon de la landaj asocioj. Estis starigita Konsilantaro de la Esperanto-Movado, konsistanta el komitatanoj de UEA, reprezentantoj de aliĝintaj asocioj, ĉefdelegitoj, honoraj kaj dumvivaj membroj ktp. UFE estis likvidita, kaj UEA fariĝis federacio de naciaj societoj, sed al ĝi plue povis aliĝi individuaj membroj. La gvidado de UEA troviĝis en la manoj de Internacia Komitato, elektata de la landaj asocioj kaj de la delegitoj. Tiu komitato elektis la Centran Estraron de UEA. La supera instanco tamen estis la ĝenerala voĉdonado de la delegitoj aŭ de la individuaj („aktivaj") membroj, kaj ne tiu de la landaj asocioj.

Ĉar montriĝis, ke la financaj problemoj estis multe pli gravaj ol oni pensis, post unu jaro ŝanĝiĝis la gvidantoj de UEA. Kiam i.a. Privat kaj Cseh ne estis reelektitaj en Stockholm, proteste eksiĝis ankaŭ Stettler kaj Jakob. La nova estraro, prezidata de la franca generalo Louis Bastien (1869—1961), kaj la nova direktoro Robert Kreuz (1894—1936), tuj enkondukis rigoran ŝparadon.

Dume la Asocio estis tiom absorbita de siaj internaj aferoj, ke ĝi komplete neglektis seriozan eksteran agadon. La emo troigadi alprenis preskaŭ groteskajn formojn, dum en Germanio pariĝis grava atenco kontraŭ la Movado, kiu kulminis en la malpermeso de organizita agado en somero de 1936 (kio ĉe la paralizita UEA ne elvokis profundan partoprenon). Antaŭe kelkaj funkciuloj daŭrigis la adaptadon de la Movado al la supozataj bezonoj de la nuntempo: tuj post la estrar-ŝanĝo en Stockholm la revuon *Esperanto* makulis artikolo por la nazia vidpunkto pri la rasa problemo — samnumere Lidja Zamenhof levis sian voĉon, jam preskaŭ senesperan, por la paciga kaj kontraŭŝovinisma misio de Esperanto —, kaj okaze de la nova jaro 1935 la vicprezidanto Anton Vogt, membro de la nazia partio, anoncis novorientiĝon de la Movado per artikolo „Nova Celo — Nova Spirito!", kies terminologio, gvidi... batali... ordoni..., sufiĉe klarigas ĝian koncepton. Sekve de la premoj de naziaj esperantistoj, jam en 1934 ĉ. dudeko da judaj

delegitoj en Germanio devis demeti siajn funkciojn en UEA.

La oficiala internacia Movado konservis sian neŭtralismon, eĉ kiam la plua antaŭenmarŝo de la faŝismo sufokis poresperantan agadon en unu lando post la alia. Anstataŭ protesti kontraŭ la persekutoj, pluraj el la tiamaj gvidantoj asertadis, ke Esperanto ja ne kontraŭas patriotajn sentojn kaj ke ankaŭ esperantistoj amas sian patrolandon, kvazaŭ Zamenhof neniam diris: „Vi, nigraj semantoj de malpaco, parolu nur pri malamo de ĉio, kio ne estas via; parolu pri egoismo, sed neniam uzu la vorton 'amo', ĉar en via buŝo la sankta vorto malpuriĝas!"

Tia timemo restas des pli nekomprenebla post unu precedento, kiam UEA ja energie klopodis defendi siajn interesojn: sekve de la malpermeso de agado por UEA en Soveta Unio, la Estraro protestis „kontraŭ tiu bolŝevika perfortigo", transdonante „la esprimon de sia varma simpatio al la subpremitaj rusaj samideanoj". Tiutempe — en 1923 — temis nur pri centrigo de ĉia por- kaj peresperanta agado en la manoj de SEU, sed kiam tia agado mem estis komplete nuligita en Germanio kaj Soveta Unio, la neŭtrala Movado grandparte silentis.

Nur malfrue, post la detruo de Ĉeĥoslovakio kaj Aŭstrio, en novembro 1938, kiam UEA — ne sen propra kulpo — ludis jam preskaŭ sensignifan rolon, oni povis legi en ĝia organo la vokon „For la Iluzion!" kaj deklaron jenan: „Resti indiferenta, do neŭtrala malnova koncepto, estus perfidigo de niaj idealoj. Esperanto staras kaj sukcesas nur kun reĝimo respektanta liberecon individuan." Kiam la militeksplodo konfirmis tiajn dirojn, la jugoslavia revuo *La Suda Stelo* kritike skribis: „Per neŭtraleco ni intencis utili al Esperanto, sed fakte ni malutilis. Spite nian neŭtralecon, malamikoj restis plue malamikoj kaj malpermesis — kie ajn ili povis — nian movadon. Sed pro nia plena neŭtraleco ni preskaŭ perdis ĉiujn simpatiojn en la progresemaj rondoj."

14.3.5 Fondo de Internacia Esperanto-Ligo: Organiza Dueco

La jaron 1935 UEA povis fini unuafoje sen deficito, sed la internaj malakordoj kulminis en 1936. Post la morto de Kreuz, nova direktoro fariĝis la Anglo Cecil C. Goldsmith (1889—1972). La financan krizon kaŭzis, interalie, la altaj vivkostoj en Ĝenevo. Tial la Estraro decidis transporti la Centran Oficejon al Londono, kie la mastrumaj elspezoj estus je 50% malpli, kaj la bibliotekon al Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Sed kvin svisaj membroj, inter kiuj troviĝis Hans Jakob, baziĝante sur la Statuto, kiu ne permesis translokigon de la sidejo al alia lando sen decido de la

delegitoj, iniciatis proceson kaj postulis voĉdonadon de la delegitoj. Rezultis, ke 80% de la voĉdonintaj delegitoj aprobis la estraran planon, sed la Ĝenevanoj plu persistis kaj serĉis formalajn erarojn en la proceduro. Post kiam fiaskis repacigaj traktadoj dum la UK en Vieno (1936), la Estraro fine vidis neniun alian eblecon ol krei novan organizaĵon kaj forlasi la proceson. La „obstina negativa volo" (Waringhien) de la protestintoj, kiuj taksis ian svisan misiemon, nur ankoraŭ karikaturon de la intencoj de Hodler, pli grava ol financan resaniĝon de la Asocio, do sekvigis disduiĝon de la neŭtrala movado: la 18-an de septembro 1936 Generalo Bastien anoncis la fondiĝon de Internacia Esperanto-Ligo (IEL) kun sidejo en Britio.

Aliĝis al IEL preskaŭ ĉiuj landaj asocioj kaj — kontraŭe al la dogmo de la svisa UEA, ke organizaĵo kun individua membreco ne estas harmoniigebla kun federaciiĝo de landaj organizaĵoj — ankaŭ grandega plimulto de la individua membraro de UEA (sen kiu la Ligo ne povos vivi, kiel deklaris D-ro Lapenna, enirinta la Estraron en 1938), tiel ke IEL povis kalkuli en 1938 entute 13.000 anojn en 60 landoj. Longa revo de Teo Jung transformi sian *Heroldon* en centran organon de la Movado parte plenumiĝis, ĉar — apud la monata *Esperanto Internacia* — la semajna *Heroldo* fariĝis en oktobro 1936 oficiala organo de IEL, ambaŭ sub lia redakto (ĝis aprilo 1940).

IEL disvolvis plurajn agadojn kaj dediĉis apartan atenton al informado, i.a. kunvokante en 1937 Konferencon „Esperanto en la Moderna Vivo" en Parizo, ĝis la milito diktis al ĝi limigon de ĝia laboro je regula eldonado de la Jarlibro kaj de *Esperanto Internacia*. La centro ekde decembro 1936 troviĝis en domo donace ricevita en Heronsgate, vilaĝeto apud Londono. Filia Oficejo de IEL — Propaganda Fako — estis honorofice gvidata de Ernfrid Malmgren (Stockholm). Tiu fako, kiu zorgis pri koordino de la informado inter la landaj asocioj, liveris multajn realecajn proponojn por pli efika informa agado. Eĉ dum la milito Goldsmith sukcesis gvidi la Ligon sendeficite.

La malnova UEA, ĉiam kun la CO en Ĝenevo, klopodis plue aktivi, lanĉante personan proceson kontraŭ Bastien kaj eldonante Jarlibron kaj la revuon *Esperanto*, sed arigante fine nur kelkajn centojn da membroj, precipe en Svislando. Dum la milito ĝia agado preskaŭ tute ĉesis — krom la Esperantista Interhelpo, fondita unue por subteni viktimojn da naziismo kaj milito, poste por organizi la serĉadon de perdiĝintaj esperantistoj.

La membronombro de IEL, kiu eĉ de 1940 ĝis 1943 restis inter 4.000 kaj 5.000, rapide kreskis, precipe en la kategorio de Membro-Abonanto, tuj post la repaciĝo. En 1946 ĝi kalkulis 15.760 membrojn

ili malofte atingis la pensolargon de sia „Majstro". Okaze de la unua postmilita UK, la 32-a en Bern en 1947, koliziis la kontraŭaj tendencoj, kiam ok landaj asocioj prezentis projekton de rezolucio al la Kongreso, en kiu estis dirite, ke la Kongreso kun profunda indigno kondamnas la sennombrajn terurajn naziajn kaj faŝistajn krimojn, kies viktimoj estis milionoj da senkulpaj homoj, inter kiuj miloj da esperantistoj, inkluzive la familion Zamenhof. La projekto estis eksplicite direktita kontraŭ faŝismo kaj nova militdanĝero. Dum ekscita diskuto en la kongresa laborkunsido, la tekston oponis, krom ĝisostaj neŭtralistoj, ankaŭ pluraj personoj, kiuj ne konsentis nur kun kelkaj eroj en la propono. Efektive, tiu ĉi ĉefe lamis pro tio, ke ĝi ne sufiĉe prenis en konsideron la estiĝon de malvarma milito kun du malamikaj blokoj, kaj ties postefikojn ankaŭ je la Esperanto-Movado en kelkaj el la landoj, kies reprezentantoj prezentis la projekton.

La t.n. Berna Rezolucio (propono) estis malakceptita per ĉ. du trionoj de la kongresanoj en la plenŝtopita salonego — kaj la venkintoj ekstaris por kanti la Himnon. Tamen, la baza ideo de la Berna Rezolucio — ke UEA ne povas indiferente rilati al la ĝenerala evoluo de la internacia socia kaj politika vivo; ke apliki la principon de neŭtraleco eĉ rilate la persekutantojn de Esperanto signifus memdetruon; ke la Asocio povos atingi siajn celojn nur sub la kondiĉoj de paca kunlaboro inter la popoloj kaj de socia egaleco — reliefiĝis dum la postaj jaroj kiel kerno de la principaro de UEA.

Unu el la tujaj pozitivaj efikoj de la debato en ligo kun la proponita Rezolucio estis, ke la Komitato de UEA, dum tiu Kongreso mem, decidis reformuli la principon de neŭtraleco en la Statuto de la reunuiĝinta UEA. Laŭ la propono de D-ro I. Lapenna, la baza ideo de la malakceptita Rezolucio estis koncize reformulita en pozitiva senco, nome en formo de deklaro favore al la respekto de la Homaj Rajtoj. Ĝi eniris ankaŭ en la Statuton de UEA, kies dua alineo de art. 4 nun komenciĝas per la vortoj: „UEA deklaras, ke la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo". Tio okazis pli ol unu jaron antaŭ ol estis akceptita la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj la 10-an de decembro 1948. Estas menciinde, ke, aldone al la principa graveco de tiu ŝanĝo kaj la pozitivaj sekvoj interne de la neŭtrala Esperanto-Movado, tiu preciziĝo de neŭtraleco altigis la pozicion de UEA en ĉiuj demokrataj medioj kaj kontribuis al ĝia prestiĝo en la rilatoj kun Unesko, UN kaj aliaj interŝtataj organizaĵoj. En pluraj okazoj la reprezentantoj de UEA povis emfazi, ke la respekto de la Homaj Rajtoj troviĝas eĉ en la Statuto de la Asocio kiel unu el ĝiaj bazaj

— kompare kun 13.487 en 1937. Por solvi la problemon de dueco kaj krei unuecan organizaĵon, okazis intertraktadoj inter la reprezentantoj de IEL, Bastien kaj Goldsmith, kaj tiuj de UEA, Kürsteiner kaj Jakob. Ili daŭris preskaŭ unu jaron kaj postulis multe da pacienco ĉe ambaŭ flankoj, sed fine triumfis bona volo kaj la sincera deziro krei organizaĵon, kiu konformu al la postuloj de la postmilita rekonstruo kaj al la deziro de la granda plimulto de esperantistoj.

14.4 UNUECA UEA SUR NOVA BAZO

La 28-an de aprilo 1947 estis subskribita Kontrakto surbaze de la Interkonsento de Bern (julio 1946), kiu antaŭvidis kunfandiĝon de IEL kaj UEA. Sekve estis starigita, apud la administra centro en Britio, unu plia oficejo en Ĝenevo, la t.n. Serva Centro estrata de Jakob. Aperis estonte nur unu Jarlibro kaj unu oficiala organo, la revuo *Esperanto*. Prezidanto de la reunuigita UEA fariĝis Malmgren. Estis fiksite, ke kiel bazo de la nova statuto servu la ĝisnuna de IEL kompletigota laŭ la Interkonsento. La Kontrakto estis komplete plenumita, post kiam la kompetentaj organoj akceptis la novan Statuton de UEA en aŭgusto 1948. La malnova UEA cetere alportis al la nova unueca Asocio malpli ol 300 membrojn. Pli grave estis, ke la proceso kontraŭ Bastien estis finfine ĉesigita kaj ke la Fondaĵo Hodler havigis almenaŭ restaĵon de iam impona kapitalo.

La kontentiga solvo de 1946/47 forigis superfluan duismon sur organiza kampo, finante pli ol kvardekjaran pli-malpli senfruktan diskutadon pri la oficiala organizaĵo de la Esperanto-Movado. Kvankam la ombroj de la pasinteco ne malaperis per unu bato, ili ne plu povis bremsi la impetan disvolviĝon de UEA kiel potenca reprezentanto de Esperanto en internacia kadro. Tio permesis al la Asocio multe pli celkonscie kaj efike aŭdigi sian voĉon ol eblis dum la epoko de Ligo de Nacioj, ĉar la ideo pri internacia kunlaboro ricevis per la fondiĝo de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko pli firman kaj pli vaste agnoskatan bazon, je kiu UEA povis sin apogi per siaj proponoj por pristudo de la lingva problemo, unuafoje lanĉitaj en 1946, kaj siaj rezolucioj kontraŭ lingva kaj rasa diskriminacio.

Unue, tamen, necesis rekonsideri la neŭtralecon de UEA kaj lige kun tio la mondkoncepton de la oficiala Esperanto-Movado. „Tiu-ĉi naiva internaciismo de l' tempo de Zamenhof estas for. Supozeble por ĉiam!" — tekstis en *Esperanto* fine de 1946. Sed kondamnita al morto estis ankaŭ la multe pli naiva absoluta neŭtralismo de tiuj, kiuj deklaradis sin Zamenhofanoj, kvankam

ili malofte atingis la pensolargon de sia „Majstro". Okaze de la unua postmilita UK, la 32-a en Bern en 1947, koliziis la kontraŭaj tendencoj, kiam ok landaj asocioj prezentis projekton de rezolucio al la Kongreso, en kiu estis dirite, ke la Kongreso kun profunda indigno kondamnas la sennombrajn terurajn naziajn kaj faŝistajn krimojn, kies viktimoj estis milionoj da senkulpaj homoj, inter kiuj miloj da esperantistoj, inkluzive la familion Zamenhof. La projekto estis eksplicite direktita kontraŭ faŝismo kaj nova militdanĝero. Dum ekscita diskuto en la kongresa laborkunsido, la tekston oponis, krom ĝisostaj neŭtralistoj, ankaŭ pluraj personoj, kiuj ne konsentis nur kun kelkaj eroj en la propono. Efektive, tiu ĉi ĉefe lamis pro tio, ke ĝi ne sufiĉe prenis en konsideron la estiĝon de malvarma milito kun du malamikaj blokoj, kaj ties postefikojn ankaŭ je la Esperanto-Movado en kelkaj el la landoj, kies reprezentantoj prezentis la projekton.

La t.n. Berna Rezolucio (propono) estis malakceptita per ĉ. du trionoj de la kongresanoj en la plenŝtopita salonego — kaj la venkintoj ekstaris por kanti la Himnon. Tamen, la baza ideo de la Berna Rezolucio — ke UEA ne povas indiferente rilati al la ĝenerala evoluo de la internacia socia kaj politika vivo; ke apliki la principon de neŭtraleco eĉ rilate la persekutantojn de Esperanto signifus memdetruon; ke la Asocio povos atingi siajn celojn nur sub la kondiĉoj de paca kunlaboro inter la popoloj kaj de socia egaleco — reliefiĝis dum la postaj jaroj kiel kerno de la principaro de UEA.

Unu el la tujaj pozitivaj efikoj de la debato en ligo kun la proponita Rezolucio estis, ke la Komitato de UEA, dum tiu Kongreso mem, decidis reformuli la principon de neŭtraleco en la Statuto de la reunuiĝinta UEA. Laŭ la propono de D-ro I. Lapenna, la baza ideo de la malakceptita Rezolucio estis koncize reformulita en pozitiva senco, nome en formo de deklaro favore al la respekto de la Homaj Rajtoj. Ĝi eniris ankaŭ en la Statuton de UEA, kies dua alineo de art. 4 nun komenciĝas per la vortoj: „UEA deklaras, ke la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo". Tio okazis pli ol unu jaron antaŭ ol estis akceptita la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj la 10-an de decembro 1948. Estas menciinde, ke, aldone al la principa graveco de tiu ŝanĝo kaj la pozitivaj sekvoj interne de la neŭtrala Esperanto-Movado, tiu precizigo de neŭtraleco altigis la pozicion de UEA en ĉiuj demokrataj medioj kaj kontribuis al ĝia prestiĝo en la rilatoj kun Unesko, UN kaj aliaj interŝtataj organizaĵoj. En pluraj okazoj la reprezentantoj de UEA povis emfazi, ke la respekto de la Homaj Rajtoj troviĝas eĉ en la Statuto de la Asocio kiel unu el ĝiaj bazaj

principoj. Ankoraŭfoje tio okazis antaŭ nelonge, en 1971, kiam Unesko reviziis la konsultajn rilatojn kun la Neregistaraj Organizaĵoj (NROj) kaj postulis de ili informojn pri ilia sinteno al apartismo kaj rasa diskriminacio.

Per la reunuiĝo estis inaŭgurita la vojo al nova ideologia kompreno. Kontraŭe al la intermilita periodo, kiam la Esperanto-Movado atendis rekonon de Ligo de Nacioj, sed mem neniam oficiale subtenis ĝin, la postmilita UEA proksimiĝis al la idealoj de UN kaj Unesko, konsekvence subtenas ilin kaj prezentas sian kunlaboron ne nur por solvi la lingvan problemon, sed ankaŭ per inda partopreno en tiuj aktivadoj de UN, Unesko kaj aliaj specialigitaj organizaĵoj, kiuj respondas al la celoj kaj idealoj de la Esperanto-Movado.

14.5 ESENCA BIBLIOGRAFIO

Aymonier, C., *Histoire d'une Délégation pour l'adoption d'une langue auxiliaire internationale.* Paris 1914.

Bleier, V. kaj E. Cense (red.), *Ora Libro de la Esperanto-Movado 1887—1937.* Varsovio 1937.

Boulton, Marjorie, *Zamenhof. Aŭtoro de Esperanto.* La Laguna 1962.

Bruin, G. P. de, *Gvidilo tra la Esperanto-Movado.* Amsterdamo-Parizo 1936.

Brüggemann, K., *Historio de Esperanto.* Dresden 1923.

Cart, Théophile, *Vortoj de Prof. Th. Cart.* Jasło 1927.

Courtinat, Léon, *Historio de Esperanto. Movado kaj literaturo, 1887—1960.* Vol. I-III. Bellerive-sur-Allier 1964—66.

Demidjuk, G., „Evoluo de la interna ideo". *Kvardek jaroj... de Esperanto.* Paris-Leipzig-Moskvo 1927, p. 22—27.

Drezen, E., *Analiza historio de Esperanto-movado.* Leipzig 1931.

——, *Historio de la mondolingvo. Tri jarcentoj da serĉado.* 3-a eld. Oosaka 1967.

——, *Zamenhof.* Leipzig 1929.

Durrant, E. D., *The language problem. Its history and solution.* Heronsgate 1943.

——, „La plua disvastigo de la Internacia Lingvo. Sociologia analizo". *Esperanto,* vol. 47, 1954, p. 21—27.

Esperanto dum la milito. Genève 1917.

Fišer, Andreo, *Historieto de Esperanto.* Tiflis 1911.

Flügel, J. C., „Some unconscious factors in the international language movement with especial reference to Esperanto". *The International Journal of Psycho-Analysis,* vol. 6, 1925, p. 171—208.

Forster, Peter G., „Esperanto as a social and linguistic movement /

L'esperanto come movimento sociale e linguistico". *Thought and Language in Operations / Pensiero e Linguaggio in Operazioni*, vol. 2, 1971, p. 201-230.

——, „Ideologiaj ŝanĝoj en la Esperanto-Movado". *Kontakto*, vol. 8, 1971, n-ro 3, p. 12-16.

Hodler, H., *Der Esperantismus*. Genf 1913.

——, „Kiel nin organizi?" *Jarlibro de la Esperanto-Movado*, 1933, p. 72-85.

Holmes, H. W., „Hector Hodler kaj la fondo de U.E.A.". *Esperanto*, vol. 61, 1968, p. 46-48.

Isbrücker, J. R. G., *Historio kaj organizo de la Esperanto-Movado*. Den Haag 1932.

Jakob, Hans, *Universala Esperanto-Asocio 1908—1933. Historia skizo*. Genève 1933.

Jubilea Jarlibro de la Esperanto-Movado. Genève 1937.

Ĵirkov, L., *Kial venkis Esperanto? Studo*. Leipzig 1931.

Ladevèze, R. de, *Demandaro pri la historio, literaturo kaj organizajoj de Esperanto por Esperantaj ekzamenoj*. Berlin-Dresden 1923.

Lapenna, Ivo, *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*. Rotterdam 1966.

—— (red.), *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro*. Londono 1960.

Möbusz, A., *Dokumentoj de Esperanto. Informilo pri la historio kaj organizo de la Esperanta Movado*. Berlin 1921.

Pechan, Alfonso (red.), *Gvidlibro por Supera Ekzameno II. Skizo de historio kaj literaturo de Esperanto*. Budapest 1966.

Privat, Edmond, *Historio de la lingvo Esperanto*. Vol. I-II. Leipzig 1923—27.

——,*Vivo de Zamenhof*. 5-a eld. Heronsgate 1967.

Stettler, Ed., *Hector Hodler. Lia vivo kaj lia verko*. Genève 1928.

Støp-Bowitz, C., kaj J. R. G. Isbrucker, *La Esperanto-Movado. Ĝia historio, organizo kaj nuna stato*. Oslo 1948.

Studo pri la organizo de Esperanto. Paris 1913.

Ŝirjaev, I., L. Kökény, V. Bleier (red.), *Enciklopedio de Esperanto*. Vol. I-II, Budapest 1933—34.

Tra densa mallumo. Esperanto-eseoj pri movado kaj lingvo. Kopenhago 1942.

Universala Esperanto-Asocio en la jubo de la esperantistoj. Genève 1923.

Waringhien, Gaston, „Historia skizo de la Esperanta Movado". *Lingvo kaj Vivo. Esperantologiaj eseoj*. La Laguna 1959, p. 397—423.

Zakrzewski, Adam, *Historio de Esperanto 1887—1912*. Varsovio 1913.

Zamenhof, L. L., *Originala Verkaro*. Red. Joh. Dietterle. Leipzig 1929.

——, *Leteroj de L. L. Zamenhof*. Red. G. Waringhien. Vol. I-II. Paris 1948.
Ziółkowska, Maria, *Doktoro Esperanto*. Varsovio 1959.
Esperantista Dokumentaro (1906—23). Jarlibroj, UEA (1908—40) kaj IEL (1937—47). Oficialaj raportoj, UEA kaj ICK. Kongresaj dokumentaroj.
Revuoj: *La Esperantisto, Lingvo Internacia, Oficiala Gazeto Esperantista, Esperanto* (UEA), *Heroldo de Esperanto, Esperanto Internacia* (IEL).

ĈAPITRO 15

LANDAJ ORGANIZAĴOJ POR DISVASTIGO DE ESPERANTO

15.1 ENKONDUKAJ RIMARKOJ

Jam en la frua tempo de Esperanto, la personoj parolantaj la Internacian Lingvon organiziĝis en societoj kaj grupoj. La unua esperantista societo estis fondita en decembro 1888 en Nürnberg. Post tio baldaŭ formiĝis similaj grupoj en Ruslando, Bulgario, Hispanio, Francio, Britio, Aŭstrio-Hungario kaj en aliaj landoj. La ĉefa celo de tiuj grupoj estis diskonigi la novan lingvon, organizi kursojn, publikigi lernolibrojn, ebligi la praktikadon de la lingvo. Kun la tempo la grupoj larĝigis la programon de sia laboro kaj komencis dediĉadi ĉiam pli grandan atenton al la praktika utiligo de Esperanto en la plej vasta senco, nome al altigo de la kultura nivelo de sia membraro per organizado de prelegoj, literaturaj kaj artaj vesperoj, interŝanĝado de prelegantoj kun aliaj landoj, fondado de bibliotekoj, internacia korespondado.

La lokaj Esperanto-societoj de unu lando kutime formis landan asocion, kies tasko estis kaj estas disvastigi la lingvon en la kadroj de la koncerna lando. En la sekvantaj sekcioj de tiu ĉi ĉapitro estas prezentitaj nur la plej esencaj faktoj pri la formiĝo kaj evoluo de la Esperanto-Movado en unuopaj landoj. Ili estas pritraktitaj en tri grupoj: landoj, kies Esperanto-organizaĵoj aliĝis al UEA; landoj, kies organizaĵoj aŭ komitatoj ankoraŭ ne aliĝis al UEA; aliaj landoj.

Por la plua sukcesa disvastigo de Esperanto necesis fondi ankaŭ internacian organizaĵon, kiu harmoniigus la tutan laboron kaj reprezentus la Esperanto-Movadon en mondaj kadroj. Konciza analizo de

tiu klopodo estas prezentita en la antaŭa ĉapitro de tiu ĉi verko. Post diversaj provoj kaj, kelkfoje, eksperimentoj, fine, post la Dua Mondmilito, estis trovita konvena organiza formo en la reorganizita Universala Esperanto-Asocio, kiu, kunligante en sia vasta kadro la landajn asociojn, la internaciajn fakajn kaj specialajn organizaĵojn, kaj la individuajn esperantistojn, estas hodiaŭ la supera reprezenta instanco de la neŭtrala Esperanto-Movado. Al la konstruado de la moderna UEA kaj al ĝia nuna organiza strukturo estas dediĉita Ĉap. 18.

15.2 LANDAJ ASOCIOJ ALIĜINTAJ AL UEA

15.2.1 Argentino

Karakterizaĵo de la argentina Esperanto-Movado estas la ofta kunlaboro de eksterlandanoj, ĉu enmigrintaj aŭ restantaj dumtempe en la lando. Pro la amasa enmigrado komence de tiu ĉi jarcento, la unuaj esperantistoj estis preskaŭ ekskluzive eŭropanoj: Pola rifuĝinto Polasky korespondis kun Zamenhof, kaj la Anglo Richard Sharpe („Ro Ŝo") lernis Esperanton en Buenos Aires. Sekve de la aktiveco de Katalunoj, i.a. Delfí Dalmau, la Movado ekfloris inter 1908 kaj 1910. Dekreto de la Edukministro permesis en 1909 la instruadon de Esperanto en publikaj lernejoj, vaste legata revuo aperigis kurson, kaj, krom en Buenos Aires, fondiĝis grupoj ankaŭ en diversaj aliaj urboj de Argentino. Laboristaj esperantistoj kolektiĝis en la grupo „Liberiga Stelo".

Por certigi la sukceson de tri korespondaj kursoj, fine de 1916 fondiĝis Argentina Esperanto-Asocio, kies aktiveco tamen restis limigita al la ĉefurbo; pro tio en 1941 ĝi reorganiziĝis kiel Bonaera Esperanto-Asocio. Samjare fondiĝis *Argentina Esperanto-Ligo* (AEL) dum la unua kongreso en Rosario; prezidanto estis la Brito Wilfred Goodes, sekretario la Jugoslavo Tibor Sekelj. En 1943 fondiĝis Katolika Esperanto-Asocio, i.a. helpe de la ĉina pastro Kao.

Tra tuta Latina Ameriko disvastiĝis lernolibro de Jorge Hess, *¿Sabe usted Esperanto?* (1956). En 1965 AEL estabiĝis en propra oficejo.

Ŝtataj lernejoj nur malofte instruas Esperanton, sed la lingvo estas studobjekto en instruista instituto en Rafaela, provinco Santa Fé. Krome funkcias du korespondaj kursoj, i.a. Argentina Esperanto-Lernejo, agantaj ankaŭ ekster Argentino.

Viglan aktivecon disvolvas ekde 1966 la landa sekcio de TEJO, Argentina Esperantista Junulara Organizo, kies prezidanto D-ro Ruben Feldman-González lanĉis la Programon Pasporto por ebligi ĉefamilian interŝanĝon de diversnaciaj gejunuloj.

La revuo *Argentina Esperantisto* neregule aperas ekde 1917. AEL nun havas 350 membrojn.

15.2.2 Aŭstralio

Jam en la jaro 1889 Zamenhof notis la ricevon de leteroj el Aŭstralio, kaj en lia Dua Adresaro aperas la nomoj de la plej fruaj adeptoj: D. G. Reinits kaj Herman Ritz.

Anglalingvaj lernolibroj de Esperanto komencis disvendiĝi en Melbourne en 1906. Unu jaron antaŭe John Booth fondis tie la unuan Esperanto-klubon (kun 79 membroj en 1907). Sekvis starigo de kluboj en Sydney (1909), Perth kaj Hobart (1911).

Aŭstralia Esperanto-Asocio, fondita en 1911 dum kongreso en Adelaide, baldaŭ malaktiviĝis; simile nova asocio, fondita en 1918. La nuna AEA, firme organizita en 1937, havas proksimume 370 membrojn, prizorgas libroservon kaj ekzamenojn, funkciigas informan servon kaj ĉiujare sendas delegitojn al la Universalaj Kongresoj. Naciaj kongresoj okazas ĉiun duan jaron ekde 1950.

Organo de AEA estas *The Australian Esperantist* (antaŭe *La Suda Kruco,* 1920—1934, kaj *La Rondo,* 1940—1957), ekde 1929 redaktata de F. R. Banham. Melburna Esperanto-Societo posedas la plej riĉan Esperantan bibliotekon en Aŭstralio (1.100 volumoj).

Pri la instruado de la Internacia Lingvo en lernejoj ne ekzistas leĝa preskribo; lernejestroj mem rajtas decidi ĉu instrui ĝin aŭ ne. Sekve, Esperanto estas nur sporade instruata; elstaras la altlernejo en Morwell, Victoria, kie la instruanto, Ivo Maddern, vaste korespondas per sonbendoj, diskoj ktp. kun aliaj mondopartoj.

Ano de la diplomatia servo de Aŭstralio, ambasadoro Ralph Harry, estis en 1967 elektita membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Vance Dickie, la Ministro pri Turismo, malfermis la 18-an Aŭstralian Esperanto-Kongreson en januaro 1972.

15.2.3 Aŭstrio

Pri la problemo de internacia lingvo favore juĝis jam dum la epoko de Volapük la lingvisto Hugo Schuchardt. Esperanto-Movado sur la teritorio de nuntempa Aŭstrio estis fondita de redaktoro Johann Schröder (1869-1928), prezidanto de la unua klubo en Vieno (1902) kaj estro de Ligo de Germanlingvaj Esperantistoj en la aŭstra-hungara regno (1908). De Schröder, Jean Borel kaj la eminenta pacifisto Alfred Hermann Fried aperis la unuaj lernolibroj inter 1903 kaj 1906. Jam en 1909 oni kalkulis 142 grupojn kaj 60 Esperanto-informejojn en la tuta regno. Du kongresoj okazis en Vieno (1910) kaj Graz (1913). Aŭstria Katolika Ligo Esperantista fondiĝis en 1912.

15 LANDAJ ORGANIZAĴOJ POR DISVASTIGO DE ESPERANTO

Post la Unua Mondmilito la neŭtralaj esperantistoj unuiĝis en 1923 en Aŭstria Esperanto-Delegitaro, kies organo fariĝis *Aŭstria Esperantisto* (1924—1938). La apogo de aŭtoritatoj montriĝis en diversaj formoj: en 1917 per la kreo de la unua lektorato pri Esperanto en altlernejo, gvidata de Joseph Schamanek en la Teknika Universitato de Vieno; en 1925 per la rekomendo de la Ĝenerala Direkcio de Fervojoj al la fervojistoj lerni Esperanton kaj samjare per la fondo de Ŝtata Ekzamen-Komisiono por Esperanto en elementaj lernejoj kaj gimnazioj (restarigita en 1946); en 1929 per la instalo de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Ties direktoro Hugo Steiner (1878-1969) fariĝis en 1930 ankaŭ prezidanto de reorganizita Aŭstria Esperanto-Asocio (AEA). En junio 1929 la Ministerio pri Instruado permesis la nedevigan instruadon de Esperanto en mezlernejoj.

Karakteriza trajto de la Movado estis la disiĝo en frakcioj, de katolikoj, de socialistoj, de aliaj mondkonceptoj kaj eĉ interne de la „neŭtraluloj". Nur malofte okazis kunlaboro en lingvaj demandoj aŭ ĉe paŝoj al oficialaj instancoj. Aparte signifa estis la agado de la laboristoj, unuiĝintaj en 1922, kies Aŭstria Laborista Ligo Esperantista — kun sia organo *La Socialisto* (1926—1934) — estis kultura organizo de la Socialdemokrata Partio kaj havis en 1933 53 grupojn kun 1.729 membroj; ĝia ĉefa aktivulo estis Franz Jonas (1899-1974), ekde 1965 Prezidento de Aŭstrio. Sub la kontraŭparlamenta reĝimo de Dollfuss ĝi estis malpermesita, sed la plimulto de ĝiaj anoj en 1936 rekolektiĝis en nova senpartia *Aŭstria Esperantista Federacio* (AEF), dum AEA sub Steiner rezignis sian politikan neŭtralecon kaj kunlaboris kun la Patrolanda Fronto. Post la nazia invado ambaŭ organizaĵoj devis dissolviĝi; du eminentaj aŭstraj esperantistoj, Max Joseph Metzger kaj Gustav Weber, troviĝas inter la viktimoj de la faŝisma teroro.

Tuj en 1945 refondiĝis superpartia AEF kun fakaj sekcioj de socialistoj, katolikoj kaj fervojistoj kaj Aŭstria Esperanto-Instituto. Hodiaŭ krome agas sekcioj de instruistoj kaj junularo, kaj „Societo por Internacia Interkompreniĝo", kiu regule aperigas germanlingvan informservon pri Esperanto. Kolekti unuavice simpatiantojn celas ankaŭ konkurenca organizaĵo, fondita en 1967 sub influo de Steiner („Aŭstria Esperanto-Movado").


Lektoratoj pri Esperanto troviĝas en la Universitatoj de Vieno kaj Innsbruck. Per dekreto de la 23-a de februaro 1968 la Federacia Ministerio por Instruado donis al Esperanto la pozicion de fakultativa instruobjekto kun po du lecionoj semajne; laŭ la instruplano oni povas instrui la lingvon en la 3-a kaj 4-a klasoj de





N. Aleksiev (transprenanta altrangan ŝtatan ordenon por BEA, en 1968) jam longe prezidas la plej grandan landan asocion de UEA.

Maldekstre: M. Jaumotte elstaris en la belga Movado.
Sube: H. Steiner – sinonimo de la Internacia E-Muzeo en Vieno.





M.C. Noll dum pluraj jardekoj estis la animo de la dana Movado.

ĉeflernejoj (12-14jaraj infanoj). *

La ĉefepiskopo de Salzburg, Eduard Macheiner, ricevis komision de la ekleziaj aŭtoritatoj en Romo ekzameni kaj aprobi ĉiujn liturgiajn tekstojn en Esperanto.

Post kvar kongresoj en Vieno, de UEA en 1924 kaj 1936, de SAT en 1925 kaj 1962, la aŭstria ĉefurbo gastigis en 1970 sukcesan 55-an Universalan Kongreson, dum kiu la tradicia bonvolemo de la aŭtoritatoj al Esperanto ricevis plian unikan variaĵon per Alta Patroneco kaj la inaŭgura esperantlingva salutparolo de Prezidento Jonas.

15.2.4 Belgio

Fine de la pasinta jarcento la esploristo Charles Lemaire ekvarbis por Esperanto per paroladoj kaj gazetartikoloj, kaj en 1902 li per propra mono fondis la monatan revuon *Belga Sonorilo*. Grupoj fondiĝis en Bruĝo (1902), Gent, Antverpeno (1903), Lieĝo (1904) kaj Bruselo (1907). Lemaire fariĝis la unua prezidanto de Reĝa Belga Ligo Esperantista (RBLE), kiu estis fondita en junio 1905. Sed en la lingva skismo de 1908 ne nur Lemaire, sed proksimume triono de la gvidantoj de RBLE transiris al Ido; la restintaj membroj elektis novan estraron kaj aperigis novan organon *Belga Esperantisto*.

Belga Esperanto-Instituto, fondita en 1926, eldonis i.a. du volumojn de *Belga Antologio*. En 1930 estiĝis Flandra Ligo Esperantista (FLE), kiu organizis proprajn kongresojn kaj eldonis *Flandra Esperantisto*, krome Flandra Esperanto-Instituto.

Inter la mondmilitoj, pro la ekzisto de sufiĉe forta diversideologia pac-movado, multaj pacemaj kaj agemaj personoj pretis lerni Esperanton kaj aktivi en la Movado, vidante en ĝi faktoron, kiu povas kunhelpi alporti mondpacon. Foje FLE havis pli ol sepdek grupojn, sole en la flandra parto. Sed post la Dua Mondmilito la Movado tiel malfortiĝis, ke necesis koncentri la restintajn fortojn. Komence de oktobro 1961 estis decidita la kunfandiĝo de RBLE kaj FLE al *Belga Esperanto-Federacio* (BEF), kiu oficiale ekfunkciis la 18-an de januaro 1962; fine de tiu jaro ĝi havis 600 membrojn. Aldoniĝis junulara sekcio, Belga Esperantista Junulara Organizo, kaj la prizorgado de libroservo estis cedita al leĝe registrita „Eldonejo-Librejo Sonorilo" en Bruĝo (1962). Dumonata *Sonorilo* anstataŭis la du ĝistiamajn organojn.

* Eblas fari ŝtatajn ekzamenojn pri Esperanto antaŭ ekzamen-komisiono de la Ministerio pri Instruado. Dum la laborjaro 1971-72 la lingvo estis instruata en la Pedagogia Instituto de Vieno al 15 instruistoj, krome en sep klasoj de kvin lernejoj en Vieno kaj en kelkaj klasoj en Graz.

BEF havas tri sekciojn, ĉiu kun propra estraro: nederlandlingvan, franclingvan, kaj bruselan. Super tiuj funkcias komuna estraro, kies unua prezidanto fariĝis Maurice Jaumotte (1899-1970) — unu el la plej elstaraj personoj de la belga Movado kaj de 1964 ĝis 1969 estrarano de UEA.

Specife belga laborista Movado neniam ekzistis, ĉar la Flandroj kaj Valonoj kunlaboris en la nederlandlingvaj resp. franclingvaj laboristaj Esperanto-asocioj. Belgio gastigis tri Universalajn Kongresojn, en Antverpeno (1911 kaj 1928) kaj Bruselo (1960), kaj same tri SAT-Kongresojn, en Bruselo (1924 kaj 1938) kaj Gent (1961); inter 1951 kaj 1963 el la dek unu Beneluksaj Esperanto-Kongresoj kvin okazis en belgaj urboj.

La Instruministerio deklaris en 1963, ke la instruado de Esperanto inter „kromaj kursoj" ne estas malpermesita, t.e. ke lernejestro rajtas enkonduki la lingvon laŭ sia propra iniciato. En 1968 la Ministerio precizigis, ke iu normala aŭ perfektiga lernejo, malfermante kurson de Esperanto-instruado por estontaj instruistoj, povas peti de la ministro agnoskon de tiu kurso kaj de la diplomo disdonota post celkonforma ekzamenado. Oni aldonis, ke tiu konsentita agnosko povos esti konsiderata kiel ĝenerala oficialigo, valora por aliaj similaj lernejoj. En 1968 la unua kurso estis malfermita en la Lieĝa Supera Pedagogia Lernejo. En 1971 nova nederlandlingva versio de la kurso „Esperanto programita" altiris pli ol 800 kursanojn.

Por sia kultura aktiveco BEF ricevas subvencion de la belga ŝtato. La rektoro de la konata Eŭropa Kolegio en Bruĝo, Hendrik Brugmans, salutadresis Internacian Esperanto-Kongreson en Antverpeno (printempo 1972), kies preskaŭ 500 partoprenantoj el 14 landoj akceptis rezolucion kontraŭ lingva diskriminacio.

15.2.5 Brazilo

Pri Esperanto unuafoje atentigis grava revuo en 1898. En 1904 Hachette aperigis portugallingvan eldonon de la lernolibro de Cart, *Primeiras Lições de Esperanto,* en traduko de Antonio Caetano Coutinho (1879-1970). Organizita movado komenciĝis du jarojn poste per la ekapero de Esperanto-kluboj en diversaj urboj (la unua en Campinas). Krome, en 1906 ministeria dekreto deklaris Esperanton klara lingvo en telegrafio. Dum la Unua Kongreso, en julio 1907, estis fondita Brazila Ligo Esperantista (ekde 1949: *Brazila Esperanto-Ligo),* kiun prezidis ĝis 1909 la eminenta verkisto Everardo Backheuser, poste ĝis 1946 Alberto Couto-Fernandes. En 1913 unuaj leĝoj permesis la nedevigan instruadon de Esperanto en lernejoj.

Tamen, post 1916, pro la militaj malfacilaĵoj kaj la fermo de la Esperanto-fako de Hachette — kio rarigis Esperantajn librojn ĉe la

librovendejoj — la brazila Movado travivis longtempan stagnadon. Kvankam BLE estis rekonita kiel societo de publika utilo (1921) kaj surbaze de parlamenta decido (1922) ricevis jaran subvencion, ĝi preskaŭ mortis ĝuste pro la troa fido al registara patronado kaj la manko de praktika apliko de la lingvo. Malmultaj landoj havis tiom da leĝoj, dekretoj kaj decidoj favoraj al Esperanto; la Oka kaj Naŭa Kongresoj en 1926 kaj 1936 ĝuis ĉian apogon de la aŭtoritatoj, sed la partoprenantoj apenaŭ parolis la lingvon.

Revigliĝo okazis nur en 1937, kiam — dank' al iniciato de Ismael Gomes Braga (1891-1969) — Brazila Spiritisma Federacio transprenis la eldonadon de novaj lerno- kaj legolibroj, ankaŭ hispanlingvaj por cetera Latinameriko. Sekvis naciaj kongresoj kun pli granda partopreno ol antaŭe, estis eldonitaj poŝtmarkoj kun Esperanta temaro, kaj pluraj sciencaj kaj kulturaj kongresoj rezoluciis favore al Esperanto.

Tre grava estis la fondo (en 1951) de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, kiu nun, interalie, subtenas propran eldonejon kaj organizas ĉiujarajn seminariojn. Same reliefa estis la kreo (en 1965) de Esperanto-kurso ĉe la Federacia Universitato de Ceará. Post kelkjara aktiveco sur loka nivelo, en 1967 estis fondita Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO), kiu aliĝis al TEJO. Ĉiusemajne tri radiostacioj elsendas en la Internacia Lingvo. El pluraj periodaĵoj menciindas la trimonataj *Brazila Esperantisto* kaj *Impulso,* organoj de BEL resp. BEJO. BEL kaj kelkaj el la 30 lokaj societoj estas rekonitaj kiel institucioj de publika utileco; kelkaj societoj ricevas subvenciojn. Anstataŭ BEL, ekde 1973 Kultura Kooperativo de Esperantistoj estas Landa Asocio de UEA por Brazilo.

15.2.6 Britio

La unua esperantisto estis R. Geoghegan, Irlandano, kiu korespondis kun Zamenhof jam en novembro 1887. La unua societo estis fondita en Keighley en novembro 1902. En novembro 1903 aperis la unua brita Esperanto-gazeto, *The Esperantist,* kaj en oktobro 1904 estis fondita *Brita Esperanto-Asocio* (BEA) kun 20 grupoj. La membraro daŭre kreskis kaj atingis 3.030 en 1946, sed malkreskis ĝis 1962, kiam la anoj nombris 1.369. BEA posedas propran domon en Londono, dungitan sekretarion kaj unu-du dumtempajn helpantojn. En la sama konstruaĵo troviĝas la granda Biblioteko de BEA, kiu havas pli ol 30.000 librojn, libretojn kaj broŝurojn. La organo de BEA estas *The British Esperantist,* regule aperanta, plejparte ĉiumonate, ekde januaro 1905.

Ekzistas kelkaj tre aktivaj fakaj organizaĵoj, inter ili SATEB („SAT en Britio"), Asocio de Esperanto-Instruistoj (ETA) kun 230 mem-

broj, FBCE (sekcio de KELI), kies membraro kreskis de 72 en 1960 ĝis 155 en 1966, kaj Junularo Esperantista Brita, fondita en 1959 de Humphrey Tonkin, kun sia organo *Kial Ne?* Inter la lokaj grupoj elstaras pro sia alta nivelo la Londona Esperanto-Klubo. Esperantlingvaj diservoj okazas regule en kvar urboj ĉiumonate.

Britaj Kongresoj de Esperanto okazas ĉiujare dum Pasko aŭ Pentekosto. La 52-a Kongreso en Manchester (1968) havis la rekordan nombron de 459 partoprenantoj; la 53-a unuafoje okazis ekster la lando, en Dublin (Irlando). Sep Universalaj Kongresoj okazis en britaj urboj: Kembriĝo (1907), Edinburgo (1926), Oksfordo (1930), Londono (1938), Bournemouth (1949), Harrogate (1961) kaj Londono (1971).

En 1930 D-ro John Buchanan testamentis 4.000 pundojn al la Universitato de Liverpool por la instruado de Esperanto. Prof. W. E. Collinson iĝis la unua lektoro. En 1949 la Edukministro deklaris, ke li estas nek por nek kontraŭ la instruado de Esperanto en lernejoj. Ĉar la decido sekve apartenas al la lernejestroj, nuntempe nur en ĉ. 22 lernejoj Esperanto estas instruata; krome en 15 vesperaj institutoj al plenkreskuloj. Ekde 1965 ekzistas ŝtata ekzameno pri Esperanto en la kadro de la *Certificate of Secondary Education* aranĝoj, por lernejanoj, kiuj studis dum minimume kvin jaroj en iu duagrada lernejo. Krome, la Reĝa Societo de Artoj regule ekzamenas pri Esperanto en tri gradoj; la unua ekzameno okazis en 1931.

BBC lastatempe pli ofte menciis la Internacian Lingvon kaj okazigis televidajn intervjuojn kun reprezentantoj de la Esperanto-Movado. Gravaj eldonejoj aperigis Esperanto-librojn, ekz. lernolibron (en tri eldonoj) kaj vortaron en la serio *Teach Yourself,* biografion *Zamenhof* de Marjorie Boulton, *Ni parolu Esperanton* kaj *Secondary School Esperanto.* En 1967 fondiĝis *The Norwich Jubilee Esperanto Foundation,* al kiu jam en 1969 estis donacitaj pli ol 3.000 pundoj. Oni celas atingi kapitalon de 10.000 pundoj. Elspezebla estas nur la interezo — por kuraĝiĝi gejunulojn perfektiĝi en la lingvo.

Kvankam la membraro de BEA estas nur ĉ. 1.500 (en 11 federacioj), oni taksas, ke almenaŭ 3.000—4.000 Britoj ĉiujare eklernas Esperanton.

Sociologiaj esploroj pri la membroj de BEA, ekde 1968 faritaj de D-ro Peter G. Forster (Universitato de Hull), havis i.a. jenajn rezultojn: la britaj esperantistoj tre multe superreprezentiĝas en la pli altaj sociaj tavoloj; 40,5% de la BEA-membraro profesie aktiva havas profesiojn en la klaso de liberaj profesiuloj, instruistoj, teknikistoj kaj artistoj, kontraŭ nur 9,6% de la tuta brita popolo. Sekve, la tipa profesio de membro de BEA estas instruisto

aŭ oficisto. Evidentiĝis, krome, ke la britaj parolantoj de Esperanto pli emas voĉdoni por maldekstraj ol por dekstraj partioj. 9% estas vegetaranoj; ili same kiel la adeptoj de Labor-Partio, malplej inklinas akcenti la praktikajn avantaĝojn de la Internacia Lingvo, multe pli favorante la idealon de homa frateco kaj paco per Esperanto. Similaj esploroj pri la membraro de aliaj Landaj Asocioj ĝis nun ne estis faritaj, sed kredeble ili montros, ke la ekzemplo de Britio ne estas unika, eĉ se nur temus pri la meza aĝo de la membroj: Forster konstatis, ke preskaŭ unu kvarono de la BEA-anoj estas en la kategorio de 60-jaruloj.

15.2.7 Bulgario

La unuaj esperantistoj en Bulgario aperis jam en 1888, lernante laŭ la lernolibro por Rusoj de Zamenhof. En 1889 estis fondita la unua societo en Sofio; Miloslav S. Bogdanov eldonis lernolibrojn por Bulgaroj kaj fondis la duan Esperantan gazeton en la mondo, *La Mondlingvisto,* tamen ne longvivan.

Pli sukcesa estis Hristo Popov, la intelekta gvidanto de la frua periodo de Esperanto en Bulgario, kiu komencis varbi ĉ. 1897.

En 1906/07 komenciĝis rivaleco inter la urboj Sofio kaj Veliko Târnovo, kiu samtempe estis disputo inter du preferoj: la scienca flanko de la lingvo kaj la agado en la amasoj. La grupo en Veliko Târnovo, la „lulilo de Esperanto en Bulgario", okazigis en 1907 la unuan tutlandan kongreson, dum kiu fondiĝis Bulgara Esperantista Ligo (de 1912 B. E. Societo). Ĝia organo estas de 1919 *Bulgara Esperantisto,* hodiaŭ aperanta en eldonkvanto de 3.800 ekzempleroj.

Post nova nomŝanĝo *(Bulgara Esperantista Asocio,* 1926) estiĝis interna batalo, kun personaj malkonkordoj, politikaj trajtoj kaj financa krizo. Viglan aktivecon disvolvis Laborista Esperanto-Asocio, fondita en 1930, ĝis sia likvidiĝo en 1934.

Oficiala sukceso estis spertebla jam en 1912, kiam la Ministerio de Instruado rekomendis al ĉiuj lernejoj la lernolibron de Krestanov, kaj en 1921 Esperanto estis enkondukita kiel nedeviga fako en mezlernejojn. Periodo de malfavoro regis inter 1928 kaj 1931, kiam la lingvo estis denuncita kiel „kaŝilo de nepermesita propagando de politikaj ideoj inter la gimnazianoj", kaj ankaŭ poste multaj esperantistoj estis suspektataj, eĉ arestitaj pro „kontraŭŝtata" agado kaj mortigitaj kiel partizanoj dum la milito. En 1942 ĉesis aperi la revuo; esperantlingvaj radio-elsendoj estis nuligitaj sub germana premo.

BEA reprenis sian agadon dum la Unua Libera Kongreso en septembro 1945 en Sofio kaj i.a. eldonis kunlabore kun aliaj bal-

kanlandaj Esperanto-asocioj la revuon *Internacia Kulturo*. Seninterrompe funkcias de 1945 Bulgara Esperanto-Kooperativo.

Dum la pasintaj 15 jaroj BEA evoluis al unu el la plej fortaj landaj asocioj de UEA — kun entute pli ol 5.000 membroj kaj ĉ. 200 lokaj societoj. Gravan antaŭenpuŝon donis la 48-a Universala Kongreso en Sofio en 1963. Lige kun sia 60-jara jubileo, BEA ricevis altan ŝtatan ordenon pro sia popolutila kulturagado.

La Junulara Sekcio elstaras per siaj Festivaloj (la 10-a okazis en 1971). Sub la aŭspicioj de la Nacia Teatro „Ivan Vazov" geaktoroj organiziĝis kiel Bulgara Esperanto-Teatro. La Fremdlingva Eldonejo aperigis plurajn librojn kaj revuon *Nuntempa Bulgario* (1957—70); de 1964 ĝis 1968 aperis luksa turisma revuo *Ripozoj*.

Pri la instruado de Esperanto en lernejoj ekzistas oficiala studprogramo. Esperanto-instruistoj ricevas ĉiun helpon de la registaro, kaj la lingvo estas instruebla kiel fakultativa objekto. Ĝi estas instruata oficiale en la Sofia Ŝtata Universitato, en kelkaj superaj institutoj kaj mezlernejoj, krome — ekster la lerneja programo — en unuagradaj lernejoj. En 1971, entute 2.378 lernantoj studis Esperanton en 121 kursoj kaj klasoj, kaj kursojn organizitajn de la lokaj societoj partoprenis pli ol 2.000 personoj. Okazas ankaŭ specialaj seminarioj por instruistoj.

Fine de 1971 BEA interkonsentis kun la Komitato de Turismo pri eldonado de turismaj broŝuroj en Esperanto.

15.2.8 Ĉeĥoslovakio

La unuan lernolibron por ĉeĥoj eldonis en 1890 F. V. Lorenz, tamen Movadon iniciatis lernolibro de Th. Čejka (1900). En 1901 estis fondita klubo en Brno, en 1902 en Praha. Bohema Unio Esperantista kaj Bohema Asocio Esperantista, fonditaj en 1908, unuiĝis en 1920 en Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, kiu en 1936 reorganiziĝis al Esperanto-Asocio en ĈSR (EAĈSR). Likvidita en 1940 de Gestapo, dum la germana okupo, kaj revivigita en 1945, EAĈSR gvidis la Movadon sur la plej altan ŝtupon de la ĝisnuna evoluo.

En 1949 estis en ĈSR 4.705 organizitaj esperantistoj (EAĈSR 3.955, Slovaka Esperanto-Societo, fondita en 1945, 750). Miloj da homoj lernis la Internacian Lingvon, malgraŭ plena manko de lernolibroj. Pli ol 4.000 radio-elsendoj okazis de 1945 ĝis 1950, el Praha du ĉiutage; inter ili la „Verda Stacio" prezentis kulminajn verkojn de la nacia kulturo. Tri-kvar someraj kursoj okazis ĉiujare, de 1952 ĝis nun almenaŭ po unu somera Esperanto-tendaro. La kongreso de EAĈSR en Brno (1950) atingis rekordan ĉeeston: 1.000 personoj. La Ministerio pri Informado havis Esperanto-subsek-

cion kaj financis la eldonadon de la periodaĵo *Esperanto-Servo* (5.000 ekz.) kaj de broŝuroj. La Asocio posedis oficejon kun salajrataj oficistoj. „Ĉeĥoslovakio estis la plej forta bazo de Esperanto en la tuta mondo", konstatis pri tiu periodo L. Kökény.

Paralele kun aliaj orientaj landoj sekvis periodo de malfavoro. En 1950 EAĈSR eksiĝis el UEA, en 1951 ĉesis aperi ĝia organo *Esperantista*, bonege redaktita de D-ro St. Kamarýt, kaj en 1952 EAĈSR kaj SES estis likviditaj. La Movado restis sen centro. Lokaj grupoj transiris en kulturklubojn de la sindikata movado aŭ en lokajn klerigajn institucioj n.

Intergrupa aktiveco tamen daŭris plu — per regionaj kunvenoj, someraj tendaroj kaj landaj junularaj renkontiĝoj. Mirinde aktiviĝis la junularo, entuziasma kaj oferema, kun 35 grupoj en 1952 kaj centro en Opava. Rudolf Burda, la patro de Mondpaca Esperantista Movado, sukcesis helpi per sia *Pacdefendanto* revekiĝon de Movado en aliaj socialismaj landoj. De 1955 ĝis 1957 funkciis neoficiala Tutŝtata Konsulta Komitato, de 1959 ĝis 1969 gvidis la Movadon Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, starigita per ministeria dekreto ĉe Kleriga Instituto Praha. Ĝi eldonis la periodaĵon *Zprávy* (Informoj). Ricevinte permeson en 1968, en marto 1969 fondiĝis *Ĉeĥa Esperanto-Asocio* (1.440 membroj), kiun sekvis Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko. Ambaŭ kreis en la sama jaro Ĉeĥoslovakian Esperanto-Federacion en formo de labora kaj reprezenta komitato. En 1970 ĈEA aliĝis al UEA. Ĝia membronombro kreskis de 1.825 en 1970 al 2.349 en 1971. Jure ligitaj al ĈEA estas 32 societoj; krome, ekzistas 63 Esperanto-rondetoj en la ĉeĥa parto de Ĉeĥoslovakio. La organo de ĈEA estas *Starto*.

En Slovakio, amaskomunikiloj montris sin favoraj al Esperanto. La Slovaka Televido preparis Esperanto-kurson por 1972.

El internaciaj aranĝoj okazintaj en Ĉeĥoslovakio estas menciindaj la 13-a UK en Praha en 1921, dum kiu estis fondita SAT, konferenco „Paco per Lernejo" en 1927 kaj IKUE-Kongresoj en 1929 kaj 1936.

15.2.9 Danlando

La unua lernolibro por Danoj aperis en 1890, sed ĝi restis apenaŭ konata. Patro de la dana Esperanto-Movado estis Frederik Skeel-Gjørling (1876—1910), al kiu oni dankas vortaron (1904), lernolibron (1906) kaj lanĉadon de granda varb-kampanjo (1907). En 1906 estis fondita Societo de Danaj Esperantistoj, sekvata en 1908 de *Centra Dana Esperantista Ligo* (CDEL). La saman jaron

ekaktivis Konversacia Esperantista Klubo en Kopenhago.

Kvankam eminenta dana lingvisto, Otto Jespersen, transiris de Esperanto al Ido (kaj en 1928 al sia propra projekto Novial), la membroperdo sekve de la lingva skismo de 1907/08 ne superis en Danlando tiun, kiun tiutempe spertis aliaj landoj.

En 1928 CDEL komencis eldoni sian organon *Dansk Esperanto Blad*, kiu lastatempe evoluis al bone redaktata landa bulteno. Dum ĉ. kvardek jaroj senĉese okazis korespondaj kursoj; ilia prizorgo troviĝas en la manoj de Dana Esperanto-Instituto, kiu en 1969 ricevis permeson nomi sin „ŝtate kontrolata". Ĉiujara institucio fariĝis la feriaj kursoj gvidataj de L. Friis.

Jam en 1930 danaj aŭtoritatoj distribuis al eksterlando filmon kun esperantlingva teksto, kaj post la milito estis eldonitaj informaj broŝuroj pri Danlando kaj subvenciitaj *Dana Antologio* (1961) kaj specialaj kajeroj de *Norda Prismo*. CDEL — kun ĉ. 700 membroj — atingis dum la lastaj 15 jaroj konsiderindajn rezultojn ĉe ministroj, aliaj gvidaj politikistoj kaj ŝtataj instancoj. En 1968 ĝi lanĉis intensan informagadon ĉe 3.000 personoj en ŝlosila pozicio por havigi oficialan danan sintenon en la monda lingvo-problemo. Kuraĝiga signo estas, ke la kongreson en Roskilde (1970) malfermis per apoga parolado la Kulturministro, K. Helveg Petersen. Lia ministerio per subvencioj subtenis la agadon de CDEL.

Dana Laborista Esperanto-Asocio estis fondita en 1935, kiu kunlaboras kun SAT. El ĝiaj vicoj venas i.a. la sempatologo Paul Neergaard, kiu plurfoje aplikis Esperanton en sia fako kaj en 1949 kreis la revuon *Esperantologio*. Krom tri SAT-Kongresoj, en 1939 en Kopenhago kaj en 1947 kaj 1960 en Aarhus, en la ĉefurbo okazis du Universalaj Kongresoj, en 1956 kaj 1962 (lige kun tiu la Unua Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco). Ekzistas ne malpli ol ses Esperantaj eldonejoj: KOKO, *Dansk Esperanto Forlag*, Libroservo de CDEL, Libroservo de DLEA, Martinus-Instituto kaj la avangarda *tk* (Torben Kehlet), nun aĉetita de UEA.

En 1971 formiĝis aktiva junulara grupo. En tio grava faktoro estis tuttaga sekretario, kiu tiamaniere faris sian servon kiel militrifuzanto.

15.2.10 Finnlando

Unu el la unuaj esperantistoj, de 1891, estis la eminenta lingvisto G. J. Ramstedt (1873—1950). Esperanto enpenetris Finnlandon tra Svedio, la unuaj kluboj fondiĝis fine de la pasinta jarcento, kaj en 1904 aperis la unua lernolibro. En 1907 estis fondita *Esperanto-Asocio de Finnlando* (EAF), sed en 1914 la rusaj aŭtoritatoj mal-

permesis, kune kun ĝi, ĉiujn kulturajn asociojn.

Post la liberiĝo de la lando, en 1918, la Movado tuj revigliĝis. Pluraj kursoj okazis en la Universitato de Helsinki. De 1920 aperas la revuo *Esperanta Finnlando*. Fondita en 1921, Esperanto-Instituto de Finnlando, kiu poste servis kiel sola ligilo inter diversaj Esperanto-organizaĵoj, ricevis en 1922 — lige kun la 14-a Universala Kongreso en Helsinki — konsiderindan ŝtatan subvencion, kiu daŭris en la sama alteco ĝis 1932. En 1923 estis fondita Finna Laborista Esperanto-Asocio; malamikoj de Esperanto sukcesis dum kelkaj jaroj veki ĉe granda publiko suspektojn pri uzo de la lingvo en la servo de vasta komunisma propagando. Aliflanke, en 1928 la registaro deklaris sin preta al kunlaboro por enkonduki la instruadon de Esperanto kiel „praktika helpa lingvo por la internaciaj rilatoj".

Depost 1965 EAF estas la centra organizaĵo de ĉiuj finnaj esperantistoj. Apud ĝi ankoraŭ funkcias Fondumo Esperanto, fondita en 1955 de Vilho Setälä, kiu transprenis en 1967 la taskojn de la Instituto kaj eldonas la revuon.

De 1958 ĝis 1963 estis farita en mezlernejo en Somero kvinjara eksperimento pri Esperanto kiel unua fremda lingvo, kun tre bona rezulto. Tamen restis la regulo, ke Esperanto povas esti instruata en lernejoj nur fakultative ekster la oficialaj horoj. Lernolibro de Setälä, *Privilegia vojo al lingvoscio* (1959), ricevis legantojn ankaŭ en aliaj landoj, dum la plej nova lernolibro, *Via dua lingvo*, de Veli Kolari, estis uzata por la unua Esperanta kurso en Finna Radio.

En 1969 denove okazis Universala Kongreso en Helsinki, post kiu la agado iom vigliĝis, precipe sur loka nivelo. Kun Pollando kaj la skandinaviaj landoj okazis pli forta kunlaboro per interŝanĝo de materialoj kaj reciprokaj vizitoj. Laŭ la invito de la Universitatoj de Turku, Tampere kaj Jyväskylä, la Prezidanto de UEA, Prof. Lapenna, faris sukcesan fakan prelegvojaĝon en Finnlando en 1971, pri kiu vaste raportis la radio kaj gazetaro.

15.2.11 Francio

La unuaj paŝoj estas ŝuldataj al individuoj, Louis de Beaufront (1888) kaj Gaston Moch (1889), sed la unuan grupon — en Louhans — fondis en 1897 Gabriel Chavet. De Beaufront anoncis en januaro 1898 la fondon de *Société pour la propagation de l'Espéranto* (SPPE), kiu konsistas nur el individuoj. En 1901 Carlo Bourlet, kiel prezidanto de la pariza grupo, havigis al tiu kunvenejon en *La Sorbonne*, sidejon en *Touring Club* kaj iniciatis kunlaboron kun la eldonejo Hachette; transformi SPPE en federacion de grupoj li ne atingis, sed en 1904 ĝi ŝanĝis sian nomon al Societo Franca por

Propagando de Esperanto (SFPE).

En 1904 okazis en Calais kunveno de ĉ. 120 diversnaciaj esperantistoj. Tiu sukceso instigis la advokaton Michaux en Bulonjo-ĉe-Maro organizi la Unuan Oficialan Kongreson (1905). En la sama jaro fondiĝis Societo Esperantista por la Paco (sub Moch), Presa Esperantista Societo (sub Th. Cart), Liberecana Grupo Esperantista, la unua Esperantista Konsulejo en Reims kaj Grupo de Esperantistaj Komercistoj en Parizo. La franca ĉefurbo, kun la Centra Oficejo de Sebert, restis centro de la internacia Esperanto-Movado ĝis 1914.

En 1907 SFPE havis 2.900 membrojn, sed ekzistis 91 grupoj, 11 filiigitaj kaj 80 sendependaj. Nur en 1911, sub la impreso de la Idokrizo, SFPE fariĝis federacio kaj atingis en plena prospero dekmil membrojn. La saman jaron laboristoj kolektiĝis ĉirkaŭ sia revuo *Le Travailleur Espérantiste*, kaj en 1914 fondiĝis Franca Laborista Esperanto-Unuiĝo.

Dum en 1919/20 SFPE reformis sin kiel societon de individuoj, la laboristoj definitive apartiĝis de la neŭtrala Movado. Parizo iĝis unu el la centroj de SAT kaj en 1933 ĝia ĉefsidejo. Dezirespriimo de la Scienca Akademio rekomendis en 1921 la disvastigon de Esperanto; komenciĝis efika agado en komercaj medioj. En 1923 SFPE estis aliformigita en unuiĝon de grupoj, kaj estis kreita Federacio Esperantista Laborista por la franclingvaj regionoj, kiu en 1932 havis ĉ. 900 membrojn. En 1933 G. Waringhien fondis Francan Esperanto-Instituton. En 1937 francaj SAT-anoj reorganiziĝis en SAT-Amikaron, kiu ĝis hodiaŭ eldonas samnoman bultenon. Pro la eksplodo de la Dua Mondmilito nur mallongan efikon havis cirkulero de Jean Zay, Ministro pri Nacia Edukado, kiu en 1938 rekomendis la nedevigan instruadon de la lingvo en publikaj lernejoj.

La provon reunuecigi la francan Movadon en federaciaro, Unuiĝo Esperantista Franca (1949), sekvis plena dissplitiĝo pro personaj ĵaluzoj kaj politika fanatikeco. Peticio en 1957 rikoltis la apogon de kvin rektoroj, 6 inspektoroj, 45 profesoroj, 8.198 instruistoj, 8 membroj de Franca Instituto kaj 55 deputitoj kaj senatanoj. Depost 1962 remultiĝis kursoj en porinstruistaj seminarioj kaj diversgradaj lernejoj, kaj la Kultur-Domo de Kastelo Grésillon (kooperativo) komencis ĉiujare okazigi kulturan semajnon. Tamen, klopodoj de la renovigita *Unuiĝo Franca por Esperanto* (1962) havigi al la Unuiĝo la pozicion de „Societo de publika utileco" estis denove, pro politikaj kaŭzoj, malakceptitaj de la registaro en 1966. Gazetara fako komencis modelan informan agadon en 1967. Ĵurnalistoj de *Le Figaro* aŭ aliaj francaj gazetoj estas jam kutima vidaĵo dum Universalaj Kongresoj.

Laŭ la nuna stato, UFE estas tutlanda federacio, kiu konsistas el regionaj federacioj de grupoj kaj el fakaj asocioj. Ĝi estas akceptita de la Ministerio pri Klerigo kiel „kultura asocio" (1950) kaj estas membro de la Franca Komitato de Neregistaraj Organizaĵoj en rilatoj kun UN kaj Unesko (1959). Franca Esperanto-Instituto, jam de 1946 komuna organo de UFE kaj SAT-Amikaro, liveras kvin kategoriojn de atestoj, de elementa grado ĝis diplomo pri altaj Esperantaj studoj. De 1908 aperas pli-malpli regule *Franca Esperantisto.*

El pluraj kongresoj, menciindaj estas la Universalaj en Parizo (1932 kaj 1950) kaj en Marseille (1957) kaj tiuj de SAT en Parizo (1935, 1949 kaj 1971). En 1969 UFE organizis komunan kongreson kun Germana Esperanto-Asocio en Strasburgo.

En 1971 oni instruis Esperanton en 27 lernejoj al 350 lernantoj kaj en 44 publikaj kursoj al 340 personoj; la Instituto disdonis 240 diplomojn.

15.2.12 Germanio, Federacia Respubliko

Grandan parton de siaj unuaj adeptoj Zamenhof trovis inter Germanoj. En 1888 Leopold Einstein organizis en Nürnberg la unuan Esperantan Klubon (de eksvolapukistoj), kaj en la sama urbo aperis la revuo *La Esperantisto,* kies kostojn dum tri jaroj (1892—94) kovris W. H. Trompeter. La vera iniciatinto de Esperanto-Movado en Germanio tamen estis la Sviso Jean Borel, kiu fondis en 1903 Esperanto-grupon en Berlino; la eldonejo Möller & Borel pretigis la plej urĝe bezonatan materialon por varbado kaj memlernado. En majo 1906, dum kunveno en Braunschweig, estis fondita Germana Esperantista Societo, kiu tri jarojn poste ŝanĝis sian nomon al *Germana Esperanto-Asocio* (GEA). Jam en 1908 oni kuraĝis inviti Universalan Kongreson, kiu sukcese okazis en Dresdeno kaj al kies postefikoj i.a. apartenis la starigo de Saksa Esperanto-Instituto. Okaze de la nacia kongreso en Lübeck (1911) unuafoje aperis la kongresa festbroŝuro *Esperanto ein Kulturfaktor.* Ĝis la Unua Mondmilito GEA atingis 4.260 membrojn en 179 grupoj, Germana Laborista Esperanto-Asocio (fondita en 1911) ĉ. 1.500 membrojn en 70 grupoj.

Post la milito Germanio evoluis al unu el la plej fortaj bastionoj de la Internacia Lingvo. La registaro favoris la Movadon kaj instrukciis al la lernejaj aŭtoritatoj ĉiel ebligi la — fakultativan — instruadon de Esperanto. Esperanto-Instituto por la Germana Regno, ekde 1923 kontrolata de la Ministerio pri Internaj Aferoj, zorgis pri la ekzamenoj kaj akiris sub sia direktoro Johannes Dietterle internacian reputacion, i.a. per siaj statistikoj pri Esperanto en la mondo. Rekordan partoprenon de preskaŭ 5.000 personoj havis la 15-a UK

en Nürnberg en 1923. Okazis tiom da kursoj (ankaŭ per radio), ke ne plu eblis ilin registri. Viglan eldonan aktivecon montris la firmoj Ellersiek & Borel, Hirt & Sohn, Mosse kaj Jung (*Heroldo*). En 1928 troviĝis 441 grupoj en 1.087 lokoj kun 8.490 membroj kaj 22.378 individuaj esperantistoj. Dum GEA en 1930 havis 2.371 membrojn, la Laborista Esperanto-Asocio tamen nombris 3.887.

Post la venko de faŝismo en 1933 ĉiuj laboristaj unuiĝoj estis tuj disbatitaj. Malgraŭ konstanta malboniĝo de la klimato (jam spertebla dum la 25-a UK en Köln en 1933) GEA klopodis daŭrigi sian agadon, kun konsiderindaj cedoj al la reĝimo. En majo 1935 estis malpermesita la instruado de Esperanto en lernejoj, fine de tiu jaro ĉesis aperi la organo *Germana Esperantisto* en sia 32-a jaro, en februaro 1936 dekreto de Bormann malpermesis al nazipartianoj membrecon en Esperantaj organizaĵoj, kaj en julio 1936, sekve de ordono de Himmler, GEA mem devis ĉesigi sian aktivadon.

En aprilo 1947 estis refondita „antifaŝista kaj nepre pacifista" GEA, en kiu por la unua fojo kunlaboris „neŭtraluloj" kaj SAT-anoj. La Movado estis tre sukcesa dum tiuj unuaj jaroj: En 1948 Esperanto estis instruata en 112 popolaltlernejoj, la novfondita Germana Esperanto-Instituto (GEI) interligiĝis kun la Universitato de Munkeno, Bavara Instruista Asocio rezoluciis por la enkonduko de Esperanto en elementajn lernejojn, pluraj ministerioj asignis subvenciojn, kaj kun oficiala apogo okazis la 36-a Universala Kongreso en Munkeno en 1951.

En 1955 GEA aliĝis al UEA. La konsekvencaj SAT-anoj pro tio eksiĝis, fondante „Liberan Esperanto-Asocion por Germanlingvio". Post la milito okazis kvin SAT-Kongresoj en FRG, kaj en 1958 la urbo Mainz gastigis la 43-an UK. En la kadro de la Eŭropa Kampanjo, lanĉita en 1956, GEA agadis ĉe la instancoj de Eŭropo kaj organizis enketon pri Esperanto inter eŭropaj urbestroj.

Modelon de praktika utiligo de la Internacia Lingvo kreis Germana Esperanto-Junularo, kiu de 1957/58 ĉiujare dum la jarŝanĝaj tagoj organizis Internacian Seminarion pri aktuala temaro politika, kultura aŭ scienca. Por tiu ĉi kaj por aliaj aranĝoj ĝi regule ricevis ministerian subvencion. La registaro de Bonn eldonis en 1958, 1960 kaj 1966 tri eldonojn de informa libro *Faktoj pri Germanujo;* de 1961 ĝis 1968 aperis en 20.000 ekzempleroj senkoste distribuata *Okcident-germana Revuo.* Enketo inter politikaj partioj havigis en 1969 pozitivajn reagojn.

De 1963 ĝis 1971 la Centra Oficejo de GEA troviĝis en Nürnberg, al kies gvidanto Ludwig Pickel ŝuldiĝas pli profesi-nivela kaj efika informado. En 1971 la centro transiris al Augsburg, sed Pickel transprenis la ĝistiaman organon de GEA, *Germana Esperanto-Revuo,*

kiel sendependan internacian gazeton. Por simpatiantoj estis kreita „Ludoviko-Zamenhof-Societo por la antaŭenigo de la internacia interkompreniĝo".

Pri la instruado de Esperanto en lernejoj validas decido de la landaj Kulturministroj de 1954, ke „la instruadon de Esperanto en libervolaj studgrupoj nenio malhelpas". En julio 1971 la Kulturministro de Nordrejn-Vestfalio principe konsentis pri lerneja eksperimento rilate Esperanton kiel instruobjekton. La instruista sekcio de GEA, kiu de pluraj jaroj okazigas printempan studsemajnon kun financa subteno de la Kulturministerio de Malsupra Saksio, nun okupiĝas pri edukado de instruistoj kaj tenas kontakton kun distriktaj lernejaj administracioj. Nova ŝatata instrumetodo lastatempe fariĝis la „programita kurso" de Hermann Behrmann, laŭ kiu jam fine de 1970 preskaŭ 4.000 personoj el 43 landoj studis la lingvon.

Post 46 landaj kongresoj, GEA kongresis en 1969 kune kun la franca en Strasburgo kaj en 1970 kun la belga kaj nederlanda Asocioj en Aachen. Planata estas plua kunlaboro inter la Esperanto-asocioj de la ŝtatoj de Komuna Merkato.

En 1967 GEI estis reorganizita kiel labora komunumo de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj en FRG. GEA dividiĝas en regionaj ligoj por nordokcidenta Germanio, Nordrejn-Vestfalio, Rejno-Majno, sudokcidenta Germanio, norda Bavario, suda Bavario, okcidenta Berlino kaj Sarlando. El la fakaj sekcioj aparte aktivas la fervojista kaj instruista.

15.2.13 Greklando

La unua Esperanto-societo estis fondita en 1906 sur la insulo Samos, tiutempe princlando. Iniciatis ĝin D-ro Anakreon Stamatiadis (1867-1965), al kiu la greka Esperanto-Movado ŝuldas rekonon pro multaj atingoj, i.a. pro la unua dekreto pri deviga instruado de Esperanto en lernejoj, kiun eldonis en 1910 la princo de Samos.

Post transloĝiĝo al Ateno, Stamatiadis starigis kursojn ankaŭ tie, fondis *Helenan Esperanto-Asocion* (1926) kaj atingis eldonon de ministra cirkulero pri libervola instruado de la lingvo en lernejoj (1927). Dank' al plurfoja renovigo de tiu cirkulero, Esperanto estis seninterrompe instruata ĝis 1940 kaj — en pli limigita kadro — denove post la milito. Dum la Movado en la ĉefurbo iom stagnadis, post 1954 okazis vigla aktiveco en Thessaloniki, kies universitato enkondukis kursojn de Esperanto en marto 1971. Ĝis 1966 estis disdonitaj ĉ. 250 diplomoj de unua kaj dua gradoj, plejparte al studentoj de la Pedagogia Akademio. En 1965 estis fondita Esperanta Societo

de Heleninoj, kun dumonata revuo *La Voĉo de Esperanto en Greklando*. En la kadro de HEA, kiu nombras ĉ. 350 membrojn, lastatempe estis organizita Junulara Sekcio. Krome ekzistas, ekde 1927, Supera Helena Esperanta Instituto, kiu unuavice distribuas diplomojn en tri gradoj.

15.2.14 Hispanio

Verŝajne Esperanto estis enkondukita pere de francaj lernolibroj aŭ gazetoj. En tiu unua periodo agadis nur unuopuloj kaj malgrandaj grupoj. Rodríguez Huertas aperigis lernolibron en 1890 kaj fondis en 1892 la unuan grupon — en Málaga. Organiza periodo komenciĝis en 1903 per la fondiĝo de Hispana Societo por Propagando de Esperanto, kiu aperigis revuon *La Suno Hispana*. Inter 1905 kaj 1908 estis fonditaj grupoj en preskaŭ ĉiuj hispanaj regionoj, i.a. en Katalunio la societo „Espero Kataluna". Rezulte de la 5-a Kongreso en Barcelono (1909), kies Honora Protektanto estis Reĝo Alfonso XIII, la Movado videble progresis. Komence de 1910 fondiĝis Kataluna Esperanto-Federacio, famiĝonta per siaj Floraj Ludoj. En julio 1911 la Ministerio de Edukado permesis instrui Esperanton en ĉiuj oficialaj lernejoj, kaj en oktobro komenciĝis kursoj en la Universitatoj de Madrid kaj Zaragoza.

En 1916 la Hispanan Societon anstataŭis Zamenhofa Federacio kun la revuo *Hispana Esperantisto*. Sur la bazo de la Federacioj kataluna, aragona kaj vaska stariĝis Hispana Esperanto-Konfederacio, kiu pluekzistis ankaŭ post 1925, kiam fondiĝis Hispana Esperantista Asocio celanta unuigi ĉiujn hispanajn esperantistojn. Naciaj kongresoj okazis preskaŭ ĉiujare inter 1920 kaj 1936.

La Movado estis preskaŭ tute silentigita dum la Civila Milito. Nur en 1947 la restintaj esperantistoj fondis *Hispanan Esperanto-Federacion*. De tiam regule aperas ĝia *Boletín*. La kongresa serio rekomenciĝis en 1951. En 1968 okazis en Madrid la 53-a Universala Kongreso sub la Protektado de Ŝtatestro Franco, kaj en Tarragona la 24-a TEJO-Kongreso. La Prezidanto de HEF (ĝis 1969), Prof. Miguel Sancho-Izquierdo, estas membro de la Internacia Patrona Komitato de UEA.

Nuntempe la lingvo povas esti instruata en lernejoj dum „kromaj horoj" laŭ elekto de la lernanto. La sola katedro de Esperanto en la mondo troviĝas en la Universitato de La Laguna (Kanariaj Insuloj). Ĝia tenanto, Prof. Juan Régulo-Pérez, akiris prestiĝon en la tutmonda Movado ĉefe per sia eldonejo STAFETO, kiu dum la pasintaj 22 jaroj grave kontribuis al la riĉigo de la Esperanta literaturo.

En 1971 la Ministerio de Edukado kaj Scienco proprainiciate asignis al HEF subvencion de 20.000 pesetoj por administraj celoj.

15.2.15 Hungario

Laŭ konataj indikoj la unua hungara esperantisto estis D-ro Gabrielo Bálint, universitata profesoro pri ural-altajaj lingvoj en Kolozsvár (nuna Cluj, Rumanio). Lian unuan kurson (1897) trapasis Ábel Barabás, verkisto de la unua lernolibro por Hungaroj (1898). El Transilvanio Esperanto disvastiĝis en aliajn hungarajn urbojn (Debrecen kaj Szekszárd), kaj en 1901 fondiĝis en la ĉefurbo la unua grupo. Precipe valora estis la ĵurnalista agado de A. Marich *(La Verda Standardo)* kaj de Paŭlo Lengyel *(Lingvo Internacia,* 1900, kaj poste, en Parizo, fondiĝo de Presa Esperantista Societo, 1904). En tiu unua periodo la plej elstara personeco de la Movado estis la katolika prelato A. Giesswein, kiu kiel parlamentano eluzis siajn eblecojn por propagandi la Internacian Lingvon.

En 1911 Giesswein fondis Hungarlandan Esperanto-Societon; en 1913 estis fondita Hungaria Esperantista Societo Laborista sub prezido de I. Polgár. La Hungara Konsilantara Respubliko en 1919 subtenis la Movadon (tiutempe ekagis D-ro Géza Bárczi, la plej elstara vivanta hungara lingvisto), sed tiu simpatio malfavoris al la posta evoluado: Dum la Horthy-periodo la laborista Esperanto-Movado (parte) fariĝis kvazaŭ kaŝorganizaĵo de la eksterleĝa Komunista Partio kaj suferis pro la persekutoj de la ŝtata politika perforto. La alia (burĝa) branĉo rajtis funkcii, nur konservante sian striktan neŭtralecon kaj senpolitikecon. En 1929 okazis la 21-a Universala Kongreso en Budapeŝto.

En tiaj cirkonstancoj naskiĝis en la ĉefurbo la centro *Literatura Mondo* kaj la „Budapeŝta Skolo". La alta intelekto, eruditeco kaj multflanka genio de K. Kalocsay, la elano, pasio kaj fervoro de J. Baghy kaj la organiza talento de V. Bleier rezultigis, ke Budapeŝto fariĝis por multaj jaroj la centro de la Esperanta kulturo.

La faŝismiĝo de la registaro kreis pli kaj pli malfavorajn kondiĉojn por Esperanto. En 1935 HESL estis dissolvita. Komenciĝis enkarcerigoj kaj persekutoj de laboristaj esperantistoj. Aliflanke, la neŭtrala organizaĵo iom post iom perdis sian neŭtralecon kaj estis devigita sekvi la oficialan politikon. Dum la lasta kaj plej drasta faŝisma („sagkruca") periodo la Movado tute ĉesis.

Tuj post la Dua Mondmilito estis refonditaj HES kaj HESL; ili unuiĝis en 1947. Reaperis ankaŭ *Literatura Mondo,* sed en la periodo de la „kulto de personeco" (1950—56) la Esperanto-Movado fakte ne funkciis en Hungario.

En 1956, laŭ ministeria dekreto, estis fondita Hungara Esperanto-Konsilantaro sub prezido de Baghy; ĝi transformiĝis je *Hungara Esperanto-Asocio* en 1960. HEA ĝuas subtenon de la registaro kaj de jaro al jaro faras progresojn. Precipe grandan impulson donis la 51-a Universala Kongreso en Budapeŝto (1966). Post ĝi estis enkondukita en la Budapeŝtan Sciencan Universitaton la instruista fako „Esperanto-lingvo kaj literaturo" (gvidanto D-ro I. Szerdahelyi), ŝtataj entreprenoj eldonas lernolibrojn kaj literaturajn verkojn, kaj la Kleriga Ministerio ebligis la enkondukon de Esperanto en diversgradajn lernejojn oficiale, kiel fakultativa studobjekto. HEA eldonas helpilojn por la instruado *(Gvidlibro por superaj ekzamenoj,* en du partoj), oficialan organon *Hungara Esperantisto* (nun: *Eszperantó Magazin)* kaj la kvaronjaran revuon *Hungara Vivo.*

Internacian reputacion akiris la someraj kulturaj aranĝoj en Szeged, Gyula kaj Budapeŝto, dum kiuj prelegis konataj hungaraj kaj eksterlandaj fakuloj.

Raporto pri 1971 montras, ke HEA havas 13 teritoriajn komitatojn kaj 110 lokajn grupojn. En la grupoj estis faritaj 2.500 prelegoj. Esperanto estis instruata al 2.434 lernantoj; inter ili 154 lernantoj eĉ devige kaj al 238 lernantoj en naŭ bazaj lernejoj laŭ la internacia eksperimento pri Esperanto-instruado, interkonsentita en Maribor.

15.2.16 Irlando

En septembro 1907 estis fondita *Irlanda Esperanto-Asocio,* sub prezido de E. E. Fournier d'Albe. Al la unua estraro apartenis ankaŭ Joseph M. Plunkett, unu el la sep subskribintoj de la proklamo de Irlanda Respubliko en 1916, kiu pro tio estis ekzekutita de la Britoj.

Antaŭ la Dua Mondmilito bonkonata verkistino estis s-ino E. L. Osmond, kiu tradukis multajn irlandajn fabelojn en Esperanton; ili aperis en *International Language* (1924—1931).

La jaro 1969 estis aparte grava pro la fakto, ke unuafoje Brita Esperanto-Kongreso okazis en Dublin, la ĉefurbo de Irlando. Ĉeestis preskaŭ 200 kongresanoj. En 1970 Irlanda Esperanto-Asocio, refondita en 1966, estis akceptita kiel Landa Asocio de UEA.

15.2.17 Israelo

La unuaj hebrelingvaj lernolibroj aperis en Varsovio, en 1888, 1900 kaj 1909. Inter la eksterpalestinaj pioniroj de renovigo de la hebrea lingvo troviĝis du verkistoj, kiuj estis samtempe fervoraj Esperanto-pioniroj inter la Judoj: N. H. Najmanoviĉ en Varsovio kaj J. L.

Davidoviĉ en Odeso. En la vivo de Zamenhof oni scias pri „cionista periodo".

Germana templano, E. Schmitz, fondis en 1907 grupon en Jerusalemo, al kiu aliĝis i.a. la fama lingvisto kaj kuracisto Aharon-Meir Mazje. Sed Movado komenciĝis nur ĉ. 1921, post la enmigro de N. B. Ĥavkin kaj I. Muĉnik. Itamar Ben-Cvi, filo de Eliezer Ben-Jehuda, la ĉefa reviviginto de la hebrea lingvo, pledis por Esperanto en sia gazeto *Doar ha-Jom*. En 1924 aperis gazeteto *Hebrea Esperantisto* en Tel Aviv, kaj en 1925 okazis unua tutlanda kunveno de esperantistoj en Jerusalemo. Tiutempe la Centra Cionista Organizaĵo ekaplikis Esperanton, submetante al la Universalaj Kongresoj en 1925 kaj 1926 broŝurojn pri la progreso en Palestino (verkitajn de Imanuel Olsvanger). En 1927 aperis en Jerusalemo *Vortaro Esperanto-Hebrea de* E. C. Melamed.

Plivigliĝo, alportita per „Mezorienta Esperanto-Kongreseto" okaze de la Kvara Levanto-Foiro en Tel Aviv en 1934, ne daŭris longe, ĉar nova periodo de konfliktoj bremsis la laborojn.

Sekve de la enmigra ondo dum la Dua Mondmilito, en 1941 estis fondita Palestina Esperanto-Ligo, sub la prezido de Olsvanger. De tiam ĝis 1946 ĉiujare okazis landa kunveno de PEL, kiu en 1949, post la kreiĝo de Israelo, alinomiĝis je *Esperanto-Ligo en Israelo* (ELI). En 1950 aperis *Ekzercaro* de Zamenhof kun hebrelingvaj klarigoj.

La Movado, kiu konsiderinde vigliĝis dum la Zamenhofa Jaro en 1959, koncentriĝas ĉefe al la urboj Tel Aviv kaj Haifa; la membronombro variis inter 200 kaj 300. En 1961 ELI aliĝis al UEA. Pro la milito en junio 1967 ne povis okazi la 52-a Universala Kongreso en Tel Aviv, de kiu oni atendis novajn impulsojn por Esperanto en Israelo. Tamen, dum 1967 kaj 1968 oni komencis instrui la lingvon en du mezgradaj lernejoj en Natanja kun permeso de la Edukministro. En 1967 la Ministerio eldonis trimil ekzemplerojn de broŝuro pri la instruado de Esperanto en mezgradaj lernejoj; sekve en multaj lernejoj okazis prelegoj pri Esperanto, en la kadro de socia edukado. Ekzistas Esperanto-ekzamenoj kiel por aliaj objektoj, kaj la instruistoj estas pagataj por la Esperanto-instruado.

Helpe de la Kultura Departemento de la Laboristaj Sindikatoj, ELI ricevis novan ejon en Tel Aviv en 1968. Kiel kvaronjara organo funkcias stencilita *Nia Ligilo*.

15.2.18 Italio

Pioniro de la disvastigo de Esperanto en Italio estis, en la lastaj jaroj de la pasinta jarcento, Daniele Marignoni el Crema, kiu pu-

blikigis en 1889 la unuan itallingvan gramatikon. En Torino, en 1902, estis fondita la gazeto *L'Esperantista* kaj „Itala Societo por la Propagando de Esperanto". Fondiĝis ankaŭ la unuaj grupoj, kaj oni eldonis plurajn periodaĵojn, precipe lokajn bultenojn.

En la unuaj dek jaroj de tiu ĉi jarcento komenciĝis la klopodoj por kunligi la Esperantajn grupojn. En 1906 fondiĝis Sicilia Federacio Esperantista. Sed unueca tutnacia organizo komenciĝis nur en 1910 per la fondo de *Itala Esperanto-Federacio*, kiu, de tiu jaro, daŭre kunligis la italajn esperantistojn. En 1912 estis establita la Itala Esperanto-Katedro, kultura organizaĵo kun la celo aparte zorgi pri la instruado de la lingvo. En 1913 ekaperis, dusemajna, la gazeto *L'Esperanto*, publikigita de Antonio Paolet, kaj ĝi fariĝis la oficiala organo de IEF.

Sed la Unua Mondmilito haltigis preskaŭ ĉian agadon; la reorganiziĝo okazis nur en 1920, kiam la sidejo transiris al Milano. La posta politika situacio, nome la faŝismo ekde 1922, havis en la unua tempo favoran influon sur la Movadon: estis multaj oficialaj rekonoj, la revuo vendiĝis tra la gazetvendistoj, aperis Esperantostandoj en foiroj, estis kursoj en gazetoj kaj per radio. Prezidanto estis dum multaj jaroj Gen. Carlo Cordero di Montezemolo, vicprezidanto estis Prof. Giorgio Canuto. En 1931 kreiĝis en Milano la „Esperanto-Centro", sekretariato de IEF, kunordiganta ĉiujn italajn Esperanto-agadojn, gvidata de inĝ. Rinaldo Orengo ĝis la Dua Mondmilito. En 1935 oni organizis la unuan Universalan Kongreson en Italio, kiu estis specialaĵo: ĝi ne okazis en unu urbo sed en tri (Florenco, Romo kaj Napolo) kun ŝipa ekskurso al Afriko. Okaze de tiu kongreso komenciĝis la ĉiusemajnaj radiodissendoj en Esperanto ĉe Radio Romo.

Poste la milito kontraŭ Etiopio kaj la ĉirkaŭa naciista propagando malfortigis la Movadon; haltis la naciaj kongresoj, maloftiĝis la revuo, forte malkreskis la IEF-membraro. En 1939 la agado estis serioze malhelpata: la revuo ĉesis aperi kaj mutiĝis la radiodissendoj. Dum la Dua Mondmilito oficiala agado ĉesis. Post la milito oni klopodis refunkciigi la sekretariejon de IEF, ĉiam en Milano, sed ĝis 1949 la Movado estis tre malforta, precipe pro ĉies gravaj ekonomiaj zorgoj.

Tamen en Torino la Movado kreskis iom pli rapide; tie okazis, en 1948, la unua postmilita Esperanto-kongreso. La sidejo de IEF translokiĝis de Milano al Torino (oktobro 1949), kie troviĝis pluraj taŭgaj kaj agemaj esperantistoj, inter kiuj D-ro Carlo Borione. Li fariĝis sekretario kaj ĉefa revigliganto de la asocio. La membraro kreskis de malpli ol 300 en 1949 ĝis pli ol 1400 en 1957. En 1950 rekomenciĝis regulaj radiodissendoj, kiuj, variante de unu ĝis tri

ĉiusemajne, daŭras ankoraŭ nun. En 1951 ŝanĝiĝis ankaŭ la strukturo de la Katedro, kiu fariĝis Itala Esperanto-Instituto.

Post la reorganiziĝo de IEF ĝia prezidanteco estis ligita al la nomo de Prof. Canuto, elstara jurmedicinisto, kiu en 1956 iĝis ankaŭ Prezidanto de UEA. Prof. Canuto mortis en 1960 kaj adv. Ademaro Barbiellini-Amidei fariĝis prezidanto. Li havigis al IEF pli taŭgan sidejon en la centro de Torino, kie ĝi estas ĝis nun. En 1962 Corrado Grazzini, kiu dum pluraj jardekoj gvidis la Instituton, cedis ĝian direktadon en pli junajn manojn.

Dum tiu ĉi periodo la membraro restis preskaŭ samnombra, sed la iniciatoj intensiĝis. En 1955 la 40-a Universala Kongreso okazis en Bologna; la ĝemeliĝo inter tiu itala urbo kaj la preskaŭ samnoma franca urbeto, kie okazis la unua Universala Kongreso en 1905, startigis la multajn ĝemeliĝojn peritajn de Esperanto. En 1956 la itala Ŝtatprezidento agnoskis IEF kiel „juran personon".


Inter la ĉefaj agadoj de la lastaj jaroj estas menciindaj la kontaktoj kun parlamentanoj kaj ministeriaj funkciuloj, la klopodoj akceptigi leĝon favoran al la enkonduko de Esperanto en la lernejojn, la regulaj organizadoj de karavanoj al Universalaj Kongresoj, la modernstila redaktado de la revuo, la publikigo de pluraj informaj dokumentoj, la ĉiujaraj naciaj kongresoj ĉiam pli atentataj de la oficialaj instancoj (en 1970 okazis sukcesa 41-a Itala Kongreso surŝipa en Mediteraneo).

Nun IEF estas estrata de konsilantaro el 13 membroj. La plimulto de la membraro (ĉ. 1.600) estas en norda Italio, en Napoli kaj Sicilio. Itala Esperanto-Instituto daŭre organizas kursojn kaj ekzamenojn; ĝia estraro konsistas el kvin personoj, ĝiaj membroj estas ĉ. 150, dividitaj laŭ pli ol 40 lokaj centroj.

15.2.19 Japanio

Inter la unuaj esperantistoj troviĝis eminentaj intelektuoj. Verŝajne la unua lernanto de Esperanto estis la zoologo Oka asajiro. La historiisto Kuroita kacumi fondis en junio 1906 Japanan Esperantistan Asocion, kaj Hasegaŭa tacunosuke (Futabatei ŝimei), la patro de la moderna japana beletro, sammonate aperigis la unuan lernolibron de Esperanto; Esperantan kurson gvidis la anarkisto Osugi sakae. Tamen, jam en 1910, pro reakciiĝo de la socio, la agado de JEA estis bremsata; la revuo *Japana Esperantisto* havis nur efemeran vivon. La Movado revigliĝis fine de 1919, kiam Ossaka kenĵi (1888—1969), la plej elstara japana esperantisto dum pluraj jardekoj, fondis *Japanan Esperanto-Instituton* kaj ĝian or-





Mijake ŝ. (supre): Kvar jardekojn profesie en la japana Movado.
P. Nylén (supre dekstre): Pasia aktivulo el la Nordo.





M. Haudebine: Nesupertakseblaj klopodoj en Hinda Unio.
H.W. Hong (maldekstre): Sukcesoj en la koreaj universitatoj.

ganon *La Revuo Orienta,* kiuj ambaŭ en 1969 festis sian 50-jaran jubileon. La disvastiĝon de Esperanto favoris ne nur ĝia homaranisma enhavo, sed ankaŭ la fakto, ke ĝi estis komprenata kiel batalilo kontraŭ la lingva imperiismo de Eŭropo kaj Usono; i.a. ekspansiistoj planis devige instrui ĝin kiel duan lingvon en konkerota orienta Azio. Lige kun tio kaj sub influo de la bahaismo, la religia societo Oomoto adoptis Esperanton, fondante en 1925 — sendepende de JEI — Esperanto-Propagandan Asocion.

Aparta agado de SAT-anoj komenciĝis en 1924; sesvoluma *Proleta Kurso de Esperanto* (1930—31, represo en 1968) estis entuziasme studata de progresemaj intelektuloj kaj laboristoj, el kies vicoj kreiĝis en 1931 Japana Proleta Esperantista Unio (JPEU), kunlaboranta kun IPE. Tiutempe la membraro de JEI kreskis al ĉ. 2000, kaj saman forton atingis la proleta Movado, ĝis en 1933/34 la ĉasado al liberalaj kaj socialistaj esperantistoj kaŭzis la disfalon de JPEU.

Post la milito la Japana Esperanto-Movado deklaris sian volon kontribui „al la konstruo de la nova mondokulturo". Nove fondita Japana Esperantista Asocio celis labori sur informa kaj organiza kampoj, dum JEI sin dediĉis ĉefe al eduko kaj studo. Tiu dualismo malaperis fine de 1950, kiam JEA dissolviĝis; sed ĝiajn taskojn transprenis ĝis certa grado la teritoriaj ligoj, fonditaj en 1951 kaj 1952, unuavice la tre aktiva Kansai Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG), kiu iom post iom fariĝis dua centro de la japana Movado, konkure al JEI en Tokio. Ties reputacion plifortigis tre sukcesa Japana Esperanto-Kongreso en 1956. Gravan antaŭenpuŝon spertis la Movado pro la 50-a Universala Kongreso en Tokio (1965). Ekde tiam intensiĝis la internaciaj ligoj de la japana esperantistaro, pli frue preskaŭ nur flegataj en la kadro de Oomoto. Kun la Sudkoreanoj estis interkonsentita regula interŝanĝo de delegacioj, kaj en la Universalaj Kongresoj nun ĉiujare partoprenas dekoj da Japanoj, precipe studentoj kaj junaj dungitoj. Daŭras la evoluo de scienca kaj literatura interesiĝo al vigla konversacia uzado, „de lingvo ideala al lingvo reala", kiel estis notite en la ĵurnalo *Asahi,* kaj Esperanto estas nun efektive praktikata dum tutlandaj kaj regionaj kongresoj kaj aro da „kunloĝadoj" (intensaj kursoj). Meze de 1970, en Tokio okazis 18 kursoj kun entute pli ol 200 lernantoj, kiujn organizis 12 junularaj grupoj.

Tiu multpromesa stato kontrastas kun preskaŭ ignorema sinteno de la registaro. Tamen, la Socialista Partio, la plej forta opozicia partio de Japanio, antaŭvidas en sia „Unua Projekto de Baza Plano por Reformo de la Eduka Sistemo" (novembro 1966) ankaŭ la devigan instruadon de Esperanto al ĉiuj infanoj en la aĝogrupo

de 8 ĝis 12 jaroj. Tion la partio motivis per tri punktoj: 1) Esperanto helpas la lernadon de aliaj fremdaj lingvoj, 2) la lernado de Esperanto apud la gepatra lingvo helpos formi internaci-konsciajn Japanojn, 3) per la ekzemplo, ke ĉiuj Japanoj lernas Esperanton, la partio farus pioniran laboron por monda paco kaj disvastigo de Internacia Lingvo. Lige kun tio, estas rimarkinde, ke el preskaŭ unu miliono da individuaj subskriboj al la Propono al UN, pli ol 160.000 estis Japanoj.

Ekde 1966 Japana Unesko-Komisiono subvencias la partoprenon de la du delegitoj de JEI en Universalaj Kongresoj. Prof. Egami fuĵio, la prezidanto de JEI, estis elektita en 1969 prezidanto de Japana Scienca Konsilantaro. — Grandan atenton, ankaŭ ekster la lando, trovis la sinbruligo de la veterana esperantisto Jui ĉunoŝin, la 11-an de novembro 1967, proteste kontraŭ la registara politiko.

Sur la Esperanta libromerkato viglas pluraj eldonejoj japanaj, i.a. Pirato kaj Amo-Akademio. Krom la ĉefe nacilingvaj *La Revuo Orienta* (JEI), *La Movado* (KLEG) kaj *Nova Vojo* (Oomoto), aperas dumonataj, nur en Esperanto, *Oomoto* kaj *l'omnibuso*.

Je dispono de lernantoj estas pluraj diversgradaj lernolibroj, kiujn en la plej multaj kazoj eldonis neesperantistaj eldonejoj. Du japanlingvaj vojaĝ-libroj, verkitaj de esperantistoj, estis tre favore akceptitaj en la japana publiko: *Mia vojaĝo en Esperantujo* de Deguĉi kjotaro (1965, angla traduko en 1968) kaj *La mondo de Esperanto* de s-ino Iŝiguro namiko (1969).

La 57-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj fine de julio 1970 en Takacuki apud Osaka superis, laŭ la nombro de partoprenantoj — 825, ĉiujn ĝistiamajn.

15.2.20 Jugoslavio

Esperanto penetris en la landojn de hodiaŭa Jugoslavio nur en 1904. En tiu jaro kelkaj ellernis la lingvon, inter kiuj D-ro Haas, advokato en Maribor, kaj M. Avramović en Beograd estis verŝajne la unuaj. Unu post la alia spontane aperis la unuaj lernolibroj: la serba de J. P. Jovanović en 1908, du kroataj de M. Ŝpicer kaj de Danica Bedeković (verŝajne la unua virino inter la pioniroj de Esperanto en tiu frua periodo) en 1909, kaj la slovena de L. Koser en 1910. Samtempe estis fonditaj Unuiĝo de Kroataj Esperantistoj en Zagreb, Esperantista Rondo en Slovenio, kaj Beograda Esperanto-Grupo. En 1909 komencis aperadi *Kroata Esperantisto*, kaj en 1910 *Serba Esperantisto*.

Post la formiĝo de la jugoslavia ŝtato en 1918, la centro de la

Movado troviĝis unue en Zagreb, kie estis fondita (dum la Unua Sudslava Esperanto-Kongreso en 1923) Sudslava Esperanto-Ligo, kaj kie efike agadis eldonejo Sudslava Esperanto-Servo, ambaŭ sub la gvido de D-ro Dušan Maruzzi.

La Akademia Esperanto-Klubo (AEK), fondita de du studentoj — Ivo Godek kaj Ivo Lapenna — en 1929 unue kiel Studenta Esperanto-Klubo en la Universitato de Zagreb, disvolvis modelan kaj tre vastan agadon sur la kampoj de informado, instruado kaj organizado. Paralele, en la sindikatoj kaj ĝenerale en laboristaj medioj efike laboris pluraj laboristaj Esperanto-societoj (LES), ekzemple en Beograd, Zagreb, Ljubljana kaj en aliaj lokoj. Tio estis malfacila periodo, ĉar la persekutoj kontraŭ Esperanto kaj unuopaj esperantistoj komenciĝis kun la establo de la diktaturo en 1929.

En 1936, post multaj internaj kaj eksteraj malfacilaĵoj, la organiza problemo estis fine solvita kaj la unueca asocio funkciis sub la nomo *Jugoslavia Esperanto-Ligo* (JEL). En 1937, dum la brila Kongreso en Zagreb (pli ol 500 kongresanoj), estis elektita tute nova estraro, kiu konsistis ĉefe el la membroj de AEK (prez. D-ro I. Lapenna, sekr. Inĝ. I. Godek). Samtempe JEL decidis aliĝi al IEL kaj elektis D-ron Lapenna komitatano (ekde 1938 li estas estrarano de IEL, poste de la nova UEA).

Malgraŭ la persekutoj kaj malpermesoj, inter 1929 kaj la invado en 1941, la Movado faris grandan progreson dank' al multaj bone planitaj agadoj kaj firma organiziteco. En 1929 funkciis kelkaj malgrandaj grupetoj; en 1935 nur 431 esperantistoj estis organizitaj; en 1941, antaŭ la invado, funkciis 38 societoj kun 1.247 membroj kaj ĉ. 10.000 personoj parolis la lingvon.

JEL konsistas el Kroatia Esperanto-Ligo (Zagreb, fondita en 1945), Slovenia Esperanto-Ligo (Ljubljana, 1946), Serbia Esperanto-Ligo (Beograd, 1946), Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (Sarajevo, 1949), Vojvodina Esperanto-Ligo (Novi Sad, 1954) kaj Makedonia Esperanto-Ligo (Skopje, 1957). En la tuta lando aktivas ĉ. 100 Esperanto-societoj kaj pluraj lernejaj grupoj. Fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj, funkciantaj en la kadro de JEL, estas JAFE (fervojistoj) kun 13 societoj kaj organo *Jugoslavia Fervojisto,* JAPE (pedagogoj, JEJA (junularo), filio de ISAE, Jugoslavia Esperanto-Instituto, kiu eldonis la periodaĵon *Kajeroj* de 1963 ĝis 1968, k.a. JAPE zorgas unuavice pri instruado en la lernejoj, seminarioj por pedagogoj en unuopaj respublikoj (la seminario en Primoŝten jam fariĝis tradicia).

Organo de JEL, *La Suda Stelo,* revuo socia, kultura, literatura kaj primovada, aperas — kun kelkaj interrompoj — ekde 1932. Aliaj revuoj estas *Jugoslavia Esperantisto* (1957—1963), la popu-

larscienca *Homo kaj Kosmo* (ekde 1963) kaj *Esperanto-Gazeto* (1966—1972). Nuntempe ankaŭ *Scienca Revuo* estas publikigata en Jugoslavio.

Krom 19 landaj kongresoj, en Jugoslavio okazis ankaŭ kelkaj internaciaj Esperanto-kongresoj: la 38-a UK en Zagreb (1953), la 29-a SAT-Kongreso en Beograd (1956) kaj la 42-a SAT-Kongreso en Novi Sad (1969). En 1963 okazis en Beograd Internacia Konferenco de Lernejoj en kiuj Esperanto estas Instruata. Pluraj internaciaj konferencoj de pedagogoj okazis en Maribor. Esperanto-somerumejoj troviĝas en Primoŝten, Bela Palanka kaj Volparia. La UK en 1973 okazis en Beograd, sub la alta patroneco de la Prezidento de Jugoslavio, Josip Broz-Tito, kiu mem siatempe lernis Esperanton. Ŝtataj eldonaj entreprenoj publikigas Esperantajn lernolibrojn kaj vortarojn. Ekde 1953 Radio Zagreb disaŭdigas en Esperanto unufoje semajne.

Pri instruado en la lernejoj vidu Ĉapitron 4.6.

15.2.21 Kanado

La unua esperantisto kredeble estis katolika Patro F. X. Solis en 1895. En 1902 aperis ilustrita revuo *La Lumo*, kiun en 1904 anstataŭis *The British Esperantist* kiel organo ankaŭ de kanadaj esperantistoj. En 1903 aperis lernolibro de Esperanto en Montreal. Ĝis la Dua Mondmilito kutime Kanadanoj membris en Esperanto-Asocio de Norda Ameriko (vidu sub Usono), kvankam portempe ekzistis ankaŭ malgranda Kanada Esperantista Asocio en Toronto.

En 1948 W. D. B. Hackett sentis deziron, ke Kanado havu sian propran asocion. En 1954 li fariĝis landa peranto de UEA kaj lanĉis enketon por esplori la demandon ĉu fondi asocion aŭ ne. Kvankam la plimulto opiniis, ke la tempo ankoraŭ ne estas matura, oni starigis en Toronto „Centron de Kanadaj Esperantistoj" kaj eldonis kvaronjaran bultenon sub la tradicia titolo *La Lumo*. Fine, la 4-an de oktobro 1957, estis fondita *Kanada Esperanto-Asocio*, kiu aliĝis al UEA en 1959. La unua landa kongreso okazis en Montreal.

La membronombro varias inter 200 kaj 300; esperantistoj troviĝas en 71 lokoj de Kanado, funkcias 12 kluboj. La estraro konsistas el dek personoj (en kvar urboj), kiuj kunsidas sesfoje jare. Regule aperas la organo *Lumo*.

15.2.22 Koreo Suda

La Internacia Lingvo venis al Koreo, antaŭ pli ol duonjarcento, el Ĉinio, el Ruslando kaj precipe de koreaj studentoj lernintaj ĝin en Japanio. Elirpunkto de movado estis malgranda kurso de Verda

E. Kim en 1916/17. Kiam dumtempe la japanaj okupantoj allasis pli da libereco sur kultura kampo, en aŭtuno 1920 povis okazi la unua publika kurso de Kim (ĉe YMCA), post kio fondiĝis Korea Esperanto-Asocio en Seulo. Multe da subteno donis la ĉiutaga ĵurnalo *Dong-A*. En Tokio aperis en 1921 la unua korelingva lernolibro.

En junio 1924 estis fondita Korea Esperanto-Instituto (KEI), kiu ekeldonis en aŭgusto 1925 la revuon *La Orienta Lumo*, poste, en 1937, *Korea Esperantisto*. En sia unua periodo, la Esperanto-Movado en Koreo estis alte taksata unuavice de intelektuloj, kiuj konsideris ĝin „la plej progresinta landonsavanta movado". Kiam ili estis persekutataj de la Japanoj, ĉiuj malliberejoj fariĝis „kvazaŭ Esperanto-lernejoj" — laŭ sciigo de Hengwi Hong (1911-68), kiu estis mem enkarcerigita. Fine ĉia publika agado por Esperanto kaj lernado de la lingvo estis severe malpermesitaj.

Korea Esperanto-Instituto estis refondita la 15-an de decembro 1945. La Ministerio pri Edukado decidis komence de junio 1950 oficiale rekomendi Esperanto-instruadon en ĉiuj universitatoj, sed kelkajn semajnojn poste eksplodis la interna milito. KEI translokiĝis en 1951 de Seulo al Taegu, kiu fariĝis centro de la Movado, establiĝante en Chunggu-Universitato, kie Hong estis profesoro pri sociologio kaj Esperanto ekde 1948.

Revigliĝo estis rimarkebla en 1956, precipe dank' al Hong, kiu organizis patronan socieron „Verda Klubo" de simpatiantaj profesoroj, juristoj, verkistoj, ĵurnalistoj tre influaj en la socio. Du jarojn poste estis fondita tre aktiva Korea Junula Esperanto-Asocio, sub gvido de Taekeng Gim. Sed en 1961 la nova militista reĝimo ĉesigis organizitan agadon. Tiu periodo daŭris ĝis 1963, kiam en Seulo estis establita *Korea Esperanto-Societo* (KES) kaj kiam en Taegu Gim sukcesis denove enkonduki Esperanton kiel oficialan nedevigan objekton en plurajn gimnaziojn. Hong tiutempe instruis al ĉ. 200 studentoj. En 1964 la vicprezidanto de la parlamento malfermis grandan ekspozicion de Esperanto en Seulo, kiun vizitis ĉ. 10.000 personoj, kaj ekaperis *Korea Revuo* (de KEI) kun tradukoj el la korea literaturo. La organo de KES, aperanta ekde januaro 1971, nomiĝas *Korea Esperanto*.

La gejunuloj ĉiujare organizas „kunvivadon". Dum la lastaj jaroj plurfoje grupoj de Japanoj vizitis Koreon, tiel ke intertempe estis decidite okazigi, ekde aŭgusto 1971, regulan ĉiujaran renkontiĝon de koreaj kaj japanaj esperantistoj.

15.2.23 Madagaskaro

En februaro 1959 estis fondita *Esperantista Asocio de Madagaskaro* (EAM), al kiu aldoniĝis en novembro 1961 Junulara Esperan-

tista Organizo de Madagaskaro. Loka monata revuo aperigis ekde septembro 1960 kurson de Esperanto en dek lecionoj.

Esperanto povas esti instruata en lernejoj, kondiĉe ke la instruisto posedas la Ateston pri Kapableco de Franca Esperanto-Instituto resp. de Malgaŝa Esperanto-Instituto, kiu konstituiĝis en februaro 1968 kaj estas leĝe rekonita. Ekspozicion pri Esperanto organizis en aprilo 1968 la junulara sekcio, kun subteno de la Kulturministerio. La Universitata Radio komencis, ekde januaro 1972, ĉiulunde dissendi lecionojn de Esperanto.

Prezidanto de EAM estis ĝis sia morto en 1964 Gervais Randrianasolo, Ministro pri Energio. La nuna prezidanto, Eugène Ravelosoñ, samtempe gvidas la Afrikan Komisionon de TEJO.

15.2.24 Monako

Unu el la pioniroj de Esperanto en tiu princlando estis, komence de tiu ĉi jarcento, la Franco Gaston Moch, kiu iniciatis fondon de grupo en 1903. Dum kelka tempo la Oceanografia Muzeo aplikis Esperanton en sia bulteno.

La nuna *Esperanto-Grupo de Monako* funkcias ekde 1955. En Monte Carlo okazis en marto 1969 Trilanda Renkontiĝo kaj en majo 1970 la 62-a Franca Kongreso de Esperanto.

15.2.25 Nederlando

La iniciatinto de nederlanda Esperanto-Movado estis Dreves Uitterdijk, kiu verkis la unuan lernolibron (1900) kaj redaktis la unuan gazeton, *Holanda Pioniro* (1902—1905). En Utrecht fondiĝis la unua loka societo (1903) kaj *Nederlanda Esperanto-Asocio „La Estonto estas Nia"* (LEEN, 1905). En 1911 estis starigita Federacio de Laboristaj Esperantistoj (FLE), kies nomo en 1947 estis ŝanĝita al Asocio de Laboristaj Esperantistoj „Fidu la Estontecon". Asocioj de katolikoj, kristanoj kaj blinduloj estis organizitaj en 1909, 1930 resp. 1929. En 1940 la germanaj okupantoj likvidis ĉiujn Esperanto-organizaĵojn kaj konfiskis iliajn posedaĵojn, oficiale malpermesante ilian agadon en marto 1941.

En 1958 la kvar ĉefaj asocioj (LEEN, FLE, kristanoj, katolikoj) fondis Nederlandan Centran Komitaton Esperantistan, kiu tamen ne montriĝis aktiva. Anstataŭis ĝin pli firma kuniĝo, Federacio de Esperanto-Organizoj en Nederlando (FEN), en 1965; plej grava frukto de la kunlaboro estas *Komuna Esperanto-Gazeto*, kiu ekde 1969 servas kiel organo de la asocioj. Al ĝi cedis lokon la tradiciaj *Nederlanda Esperantisto* (LEEN) kaj *Laborista Esperantisto* (FLE).

15 LANDAJ ORGANIZAĴOJ POR DISVASTIGO DE ESPERANTO

Jam tuj post la milito la kvar asocioj fondis komunan komitaton „Ĝenerala Nederlanda Ekzamena Komitato", kiu en 1954 decidis disponigi tri diplomojn: E (elementan), M (mezan), S (superan).

En 1959 estis fondita „Oficejo Esperanto ĉe la Instruado", kiu fariĝis Institucio en 1961. En ĝiaj laboroj partoprenas sep esperantistaj kaj kvin neesperantistaj organizaĵoj. La oficiala „Inspekcio pri Skriba Instruado" decidis en 1964 agnoski la Institucion koncerne skribajn kursojn por la instruista diplomo pri unuagrada instruado. En la sama jaro, laŭ Reĝa Decido, Esperanto estis enkondukita en la daŭrigajn elementajn kaj en la duagradajn lernejojn. Kelkajn monatojn poste alia Decido enkondukis ŝtatan diplomon pri Esperanto, kiu estas akirebla nur por profesiaj instruistoj. Ili ricevas pagon por la Esperanto-instruado. Leĝo pri prepara scienca instruado ebligas ekde 1968 la elekton de Esperanto kiel fakultativa studobjekto en diversaj mezgradaj lernejoj. La Universitato de Amsterdam havas oficialajn kursojn de Esperanto kaj eldonis duvoluman katalogon pri sia stoko de interlingvistika literaturo.

La registaro (kies multjara ĉefministro postmilita, D-ro W. Drees, estas esperantisto) ekde 1920 delegis al ĉiu Universala Kongreso reprezentanton. La Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj eldonis du broŝurojn en Esperanto. La urboj Hago kaj Amsterdam en 1931 resp. 1933 ekuzis la Internacian Lingvon en la instrukciaro en telefonkioskoj.

En Nederlando okazis kvar Universalaj Kongresoj, la 12-a en Hago (1920), la 39-a en Haarlem (1954), la 49-a en Hago (1964) kaj la 52-a en Rotterdam (1967), krome SAT-Kongresoj en Amsterdam (1931 kaj 1948), en Rotterdam (1937 kaj 1957) kaj en Utrecht (1968).

En 1929 Andreo Cseh komencis en Nederlando siajn sukcesajn kursojn. Kun s-ino Isbrucker li fondis en Hago la Internacian Cseh-Instituton de Esperanto kaj la revuon *La Praktiko*, kiu preskaŭ seninterrompe aperadis de 1932 ĝis 1970, en la lastaj jaroj prizorgata de UEA. *Heroldo de Esperanto*, de Teo Jung, aperis en Scheveningen de 1936 ĝis 1961. Aparte vigla estis la eldona agado de FLE, kiu, krom tri lernolibroj, du ampleksaj libroj pri gramatiko kaj pluraj libretoj pri lingvo kaj literaturo, eldonis, kunlabore kun SAT, du seriojn da literaturaj verkoj.

Konsiderinda atingo estis, ke en 1972 la Nederlanda Televido prezentis Esperanto-kurson aranĝitan de la institucio *Teleac*.

En Rotterdam troviĝas ekde 1955 la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio.

15.2.26 Norvegio

La unua norvega esperantisto estis studento, poste ĵurnalisto, Gunnar Olsen, kiu eklernis la lingvon en 1891, sed la fondinto de movado en tiu lando estis instruisto Haldor Midthus, kiu esperantistiĝis en 1896. Post 1905 estis fonditaj la unuaj lokaj Esperanto-grupoj, el kiuj du vivas ĝis nun: Klubo Esperantista en Oslo (fondita en 1906, refondita en 1916) kaj Grupo Esperantista de Trondheim (fondita en 1907).

La 27-an de januaro 1911 estis fondita landa asocio, *Norvega Esperantista Ligo,* laŭ iniciato de tiama studento S. Engesgaar Christie.

La Unua Mondmilito preskaŭ sufokis la norvegan Movadon. Sed en 1930 la prezidanto kaj kasisto de NEL, R. Bugge-Paulsen kaj Arne Arnessen, venigis Andreon Cseh, kiu gvidis du grandajn kursojn en Oslo. Tio inaŭguris epokon de grandaj Cseh-metodaj kursoj tra la lando, kiujn gvidis Ottmar Fischer, Henrik Seppik k.a.; fondiĝis lokaj grupoj en multaj lokoj. Juna, energia studento, Arnfinn Jensson, kiel nova ĝenerala sekretario modernigis la organizan sistemon de NEL.

Dum la Dua Mondmilito NEL ĉesigis ĉian publikan agadon; la fortoj centriĝis al lingva perfektigado de la membroj. Tial la germanaj okupantoj ne trovis ĝin sufiĉe signifa por meriti malpermeson, kaj kiam finiĝis la milito, la organiza aparato estis nedifektita.

La postmilitan tempon karakterizas la plifortiĝinta pozicio de la angla lingvo, kaj ne estas eble kolekti lernantojn por grandaj Esperanto-kursoj. Aliflanke la publiko ĝenerale aprobas la ideon de neŭtrala internacia lingvo, kaj ankaŭ publikaj instancoj kaj aŭtoritatoj tenas sin relative pozitive. En 1952 okazis la 37-a UK en Oslo sub la alta protektado de Lia Kronprinca Moŝto Olav (nuna reĝo Olav V), kaj laŭ invito de la urbestraro. La Instruministerio aprobis eksperimentajn klasojn kun Esperanto kiel unu el la studobjektoj en gimnazioj. La Turisttrafika Asocio de Oslo vaste utiligas Esperanton en sia turista propagando. Ĝi eldonis plurajn broŝurojn kaj du filmojn kun Esperanta parolo.

NEL havas regule funkciantajn Informan Fakon kaj Gazetaran Servon, korespondan kaj gazetan kursojn, Ekzamenan Komisionon ktp. Oni ofte aranĝas ankaŭ prelegvojaĝojn tra la lando por eksterlandaj prelegantoj, kiuj faras valoran reklamon por la lingvo. La laboron gvidas nun D-ro C. Støp-Bowitz kiel prezidanto kaj John Berggreen kiel ĝenerala sekretario. *Norvega Esperantisto* regule aperadas sub redakto de lektoro Johan H. Rosbach.

Bone laboras ankaŭ Norvega Esperantista Fervojista Asocio, laŭ kies iniciato la Norvegaj Ŝtataj Fervojoj kaj la Fervoja Muzeo en Hamar eldonis broŝurojn en Esperanto. En 1970 ankaŭ la Fervojoj eldonis esperantlingvan filmon pri vojaĝo en suda Norvegio.

15.2.27 Novzelando

Esperanto alvenis frue en la nuna jarcento, kiam individuoj studis ĝin per lernolibroj, verŝajne akiritaj el Britio. En decembro 1904, laŭ iniciato de Roland W. St. Clair (kiu poste ĉeestis la Kongreson en Bulonjo), 17 personoj fondis en Auckland Novzelandan Esperanto-Societon, el kiu estiĝis *Novzelanda Esperanto-Asocio* (NZEA) en 1910.

En 1925 komenciĝis serio da priesperantaj prelegoj en radio; en 1928 la ŝtata radio-stacio de Wellington disaŭdigis ĉiusemajne dudeklecionan kurson de Esperanto. Reorganiziĝo de NZEA okazis en 1929.

En 1964 okazis kursoj kun pli ol dumil geknaboj en 27 ŝtataj lernejoj — en la plimulto de ili Esperanto estis deviga studobjekto. Raporto pri 1968 indikas aktivecon en 31 diversgradaj lernejoj; en kvar mezgradaj kaj du unuagradaj lernejoj Esperanto estis instruata devige al 720 geknaboj. Krome, estis kluboj por nedeviga studo en kvin mezgradaj lernejoj, en kiuj oni instruis Esperanton al entute 285 lernantoj.

En NZEA aktivas nuntempe 20 kluboj, kiuj okazigas kursojn sialoke. Ekzistas scienca, instruista kaj junulara sekcioj. Nuntempe la asocio havas pli ol 300 membrojn en ĉ. 90 urboj.

El la 56 Universalaj Kongresoj, NZEA estis reprezentita en pli ol 30; oficiala delegito kutime transdonas la salutojn de la ĉefministro kaj de la opoziciestro en Novzelando. Dum kelkaj Universalaj Kongresoj la Turista Departemento prezentigis filmojn kun Esperantaj komentoj.

15.2.28 Pollando

La historio de Esperanto en Pollando dividiĝas en tri periodoj: 1) ekde la apero de la *Unua Libro* en 1887 ĝis la reakiro de ŝtata sendependeco fine de la jaro 1918; 2) ekde 1919 ĝis la fino de la Dua Mondmilito en 1945; 3) ekde 1945 ĝis nun — en Pola Popola Respubliko.

La unua periodo karakteriziĝas per propagandado kaj disvastigado de Zamenhofaj lernolibroj kaj vortaroj, kaj vigla gazetara propagandado fare de la unuaj pioniroj: Brzostowski, Grabowski,

Waśniewski, Belmont kaj aliaj. Oni kunlaboris ankaŭ kun la unua Esperanta gazeto *La Esperantisto*, aperanta en Nürnberg. Jam en 1893 oni fondis tiam sekretan esperantistan societon en Varsovio. Laŭleĝa societo estis fondita en Varsovio nur en 1904. En 1906 oni fondis similan societon en Lvovo, la tiama ĉefurbo de la parto de Pollando, okupata de Aŭstrio, poste en Krakovo kaj en aliaj urboj. En la sama jaro aperis la unua numero de *Pola Esperantisto* en Lvovo, kies redakcion oni translokigis en 1908 al Varsovio; tie ĝi aperadis ĝis 1926.

La plej grava propagandilo de tiu tempo estis la granda Esperanto-ekspozicio, aranĝita de Brzostowski k.a. en Częstochowa en 1908. En 1912 oni jam povis kunvoki la 8-an Universalan Kongreson al Krakovo (sub la gvidado de Prof. Bujwid kiel prezidanto kaj St. Rudnicki kaj D-ro L. Rozenstock kiel sekretario kaj kasisto), post kiu aliĝis al la Movado novaj fortoj — D-ro Czubryński, Prof. Bujwid, Prof. Kronenberg, Tadeusz Hodakowski kaj multaj aliaj. La „Grandaj" kaj „Malgrandaj" Vortaroj de Grabowski efike subtenis la disvolvadon de la lingvokono, novaj lernolibroj de Belmont, Łazica, Czarnowski, Kronenberg k.a. helpis en la lernado.

La Unua Mondmilito stagnigis la Movadon, sed ĝi ekfloris denove tuj komence de la jaro 1919, jam en libera Pollando.

Dum la dua periodo estis fonditaj pli ol 40 diversaj esperantistaj societoj en tuta Pollando kaj pli ol 30 grupoj ĉe diversaj institucioj, fabrikoj, lernejoj ktp.

En 1926 tiuj societoj unuiĝis en unu centran asocion sub la nomo „Pola Esperanta Delegitaro", gvidata de Prof. Odo Bujwid. Li ankaŭ eldonadis *Pola Esperantisto*, kiu ekde 1926 ĝis 1939 aperadis en Krakovo.

En tiu periodo okazis 9 landaj kongresoj, du Universalaj (1931 en Krakovo kaj 1937 — jubilea — en Varsovio) kaj du postkongresoj en Varsovio (1927 kaj 1931). Malgraŭ obstakloj flanke de la reakciaj fortoj, Esperanto havis en la pola socio multajn amikojn kaj bone disvastiĝis sub la gvidado de tiaj aktivuloj kiel Belmont, Bujwid, Hodakowski, Kostecki, Kronenberg, Łękowski, Zawada kaj multaj aliaj.

Tria periodo: la hitlera okupacio mortigis la tutan Movadon kaj milojn da esperantistoj en la amasaj mortigejoj, sed jam fine de novembro 1944, en la liberigita urbo Lublin, kreiĝis Esperanto-rondo. Poste similaj rondoj estis formitaj en Krakovo kaj Varsovio. Fine de 1945 oni oficiale aprobis en Krakovo la „Asocion de Esperantistoj en Pollando", kies sidejon oni translokigis en 1947 al Varsovio. Jam en 1946 fondiĝis pliaj filioj de la Asocio en aliaj

urboj, okazis 3 enlandaj kongresoj (1946 — Lodzo, 1947 kaj 1948 — Varsovio). Dank' al financa helpo de la ŝtato oni povis lukse reeldoni la ĉefverkon de Mickiewicz, *Sinjoro Tadeo,* la faman *La Faraono* de Prus kaj multajn aliajn librojn.

Esperanto-disaŭdigoj de la Pola Radio estis farataj de 1946 ĝis 1951 unu fojon semajne. Antaŭ la 44-a UK (kiu okazis en Varsovio en 1959) Pola Radio komencis denove disaŭdigi programojn en Esperanto; ĝis 1968 unu fojon tage (30 minutojn) kaj ekde 1968 ĝis nun — du fojojn tage (entute 60 minutojn dum la tago). Krome estas disaŭdigataj Esperanto-anguletoj en kelkaj nacilingvaj disaŭdigoj.

En 1967 la Ministerio por Klerigo aprobis kaj eldonis oficialan instruprogramon por elementaj kaj mezgradaj lernejoj (eldonita ankaŭ esperantlingve). Jam antaŭe la Ministerio permesis instrui Esperanton kiel nedevigan lernobjekton. En januaro 1971 oni instruis Esperanton en 102 lernejoj, inter ili en 3 altlernejoj. Ĉiujare okazas kelkcent buŝaj kursoj, kaj la nombro da lernantoj en la koresponda kurso superis 3000 personojn fine de 1970.

La nombro da libroj kaj broŝuroj eldonitaj en Popola Pollando superis 160 titolojn je la suma eldonkvanto de 640.788 ekzempleroj. Estis eldonitaj multaj lernolibroj (dum la postmilita periodo oni vendis 225.000 ekzemplerojn da lernolibroj) por kursoj buŝaj, korespondaj, kaj ankaŭ diskokurso de Pettyn laŭ moderna metodo, vortaroj Esperanto-pola (de Michalski — du eldonoj), pola-Esperanta (de Guterman — multfoje kaj lastatempe de Tymiński — fare de la ŝtata eldonejo „Wiedza Powszechna") kaj fakaj terminaroj: elektroteknikaj vortaroj, kemiaj terminaroj. Estas preparataj novaj libroj. Dekoj da plej famaj sciencistoj, artistoj kaj sociaj agantoj deklaris sian simpation al Esperanto; iliaj eldiroj estis eldonitaj en aparta libreto. Inter ili troviĝas la nomoj de ambaŭ lastaj prezidantoj de Pola Akademio de Sciencoj (kiuj konas Esperanton) — Prof. Tadeusz Kotarbiński kaj Prof. Janusz Groszkowski.

La organo de Pola Esperanto-Asocio — *Pola Esperantisto* — aperas ekde 1945 komence en Krakovo kaj ekde 1947 ĝis nun (kun interrompo en 1966) en Varsovio; krome kelkaj regionaj filioj eldonas proprajn regulajn bultenojn. Dum la jaroj 1959—1965 estis ankaŭ eldonata gazeto de la junulara sekcio de PEA, titolita *Tamen.*

Ĉe PEA ekzistas kelkaj muzikaj ensembloj, kiuj kantas Esperante, kelkaj dramartistoj kaj operkantistoj havas en sia repertuaro esperantlingvajn kantojn kaj dramverkojn, kiujn ili prezentas antaŭ esperantista publiko en- kaj eksterlande.

Fine de 1970 Pola Esperanto-Asocio ampleksis ok vojevodiajn

(regionajn) filiojn, kvindekon da urbaj filioj kaj aron da rondoj. Laboras ankaŭ sekcioj: junulara, fervojista, instruista, veterana kaj aliaj. Entute en PEA estas registritaj pli ol 4.000 membroj.

15.2.29 Sudafriko

La unuaj grupoj estis fonditaj en Pretoria en 1906 kaj en Wellington en 1908.

La centro de la Movado troviĝis en Pretoria, kie en 1926 oni notis 12 Esperanto-kursojn. Modestan Esperanto-ŝlosilon (1934) sekvis en 1954 lernolibro *n' Afrikaanse Kursus en Esperanto* de N. J. van der Merwe.

Post la milito ekagis en Kaburbo Siegfried Liebeck, kiun oni konsideris la gvidanto de la Movado en Sudafriko (ĝis lia morto en 1955). En 1952 estis fondita grupo en Johannesburg, sub la gvido de E. W. Woodruff, la ĉefdelegito de UEA; ĉefe dank' al liaj antaŭlaboroj, en 1962 estis fondita *Sudafrika Esperanto-Asocio*, kies membraro kreskis de 18 en 1963 al 50 en 1968. Ĝi aliĝis al UEA en 1970. Por antaŭenigi Esperanton en la lando, SEA disvendas, interkonsente kun Brita Esperanto-Asocio, ties gradigitajn korespondkursojn.

Du Sudafrikanoj kontribuis al la Esperanta literaturo: Edwin de Kock per siaj originalaj poemoj kaj S. A. Andrew per kelkaj tradukoj.

15.2.30 Svedio

Du jarojn post kiam aperis — en 1889 — sveda traduko de la Unua Libro de Zamenhof, fondiĝis Klubo Esperantista en Uppsala, kiu dum kelkaj jaroj estis konsiderata kiel centro de la juna Movado, ĉar sub la iniciato de V. Langlet (1872—1960) kaj P. Nylén (1870—1958) tiu klubo lanĉis — post la malapero de *La Esperantisto* en 1895 — la novan gazeton *Lingvo Internacia*. En 1898 fondiĝis ankaŭ klubo en Stockholm; fine de 1906, kiam ekzistis jam 12 kluboj, estis kreita Sveda Esperantista Societo, kies nomo ŝanĝiĝis al *Sveda Esperanto-Federacio* (SEF) post la Ido-krizo. Ĝia organo, aperanta ekde 1913, estas *La Espero*.

La urbestro de Stockholm, Carl Lindhagen, prezentis en 1911 unuafoje la problemon de tutmonda lingvo al la decido de la sveda parlamento, revenonte al tiu propono (en 1928 eksplicite celanta Esperanton) preskaŭ ĉiujare. Eldona Societo Esperanto, fondita en 1918 en Göteborg, multe helpis la Movadon eldonante vortarojn, lernolibrojn kaj literaturaĵojn. SEF disvastigis la lingvon i.a. per

koresponda kurso kaj fondis Ekzamenan Komisionon, kies taskojn poste transprenis Sveda Esperanto-Instituto.

Sveda Laborista Esperanto-Asocio estis fondita en 1921; ĝia membronombro kreskis de 200 en 1923 al 1.800 en 1936. La Esperantaj studrondoj ĉe Laborista Kleriga Asocio kelkfoje altiris pli da personoj ol ĝia anglalingva ekvivalento. La ĉefa aganto de la laborista Esperanto-Movado estis dum multaj jaroj Einar Adamson (1894—1953), kiu i.a. organizis la historie gravan 8-an Kongreson de SAT en Göteborg (1928).

La sukcesoj de Esperanto en Svedio depost ĉ. 1927 ŝuldiĝas ĉefe al kvar faktoroj: (1) la agado de eksterlandaj instruistoj (precipe Andreo Cseh kaj lia disĉiplo Tiberio Morariu), (2) aranĝo de specialaj kursoj per profesiaj instruistoj, kun ŝtata subvencio, (3) prelegvojaĝoj de eksterlandaj esperantistoj, i.a. de la Hindo L. Sinha, (4) organizitaj turistaj vojaĝoj per Esperanto, kiujn lanĉis Ernfrid Malmgren (1899—1970). Inter 1929 kaj 1934 agadis ne malpli ol 30 instruistoj el 11 diversaj landoj. Merite sukcesa estis tial la 26-a Universala Kongreso en Stockholm en 1934, kiun oficialaj instancoj malavare subtenis. Esperanta Turista Asocio organizis grupvojaĝojn al pluraj landoj ĝis la eksplodo de la Dua Mondmilito.

Tuj post la repaciĝo multaj svedaj esperantistoj sin okupis pri diversspecaj helplaboroj, i.a. sendado de donac-pakaĵoj al esperantistoj en cetera Eŭropo. En 1948 Malmö gastigis la 33-an Universalan Kongreson. En 1953 okazis la unua prelegsemajno en Frostavallen; similaj okazis en 1954, 1956, 1959 kaj 1962, kutime kun prelegoj de konataj specialistoj pri UN kaj Unesko. Dum la semajno en 1956 estis akceptita la grava *Principaro de Frostavallen* pri efika informado.

La sveda parlamento, al kiu apartenis ĝis 1970 la aktiva membro de SEF, Einar Dahl, akceptis unuanime en 1965 proponon turni sin al Unesko kun peto, ke ĝi kunmetu sciencan komisionon kun tasko fari enketon pri la eblecoj de internacia lingvo. Malmgren, kiu estis estrarano de UEA de 1934 ĝis 1956 (ekde 1947 prezidanto), estis pro siaj grandaj meritoj nomita en 1962 Honora Prezidanto de UEA. Li ankaŭ verkis i.a. la modernstilan lernolibron *Ĉies Dua Lingvo — Esperanto* (1957).

Eldona Socieo Esperanto, de 1957 en Malmö, aperigis valorajn originalaĵojn kaj tradukojn el la mondliteraturo; krome vortarojn, lernolibrojn, terminarojn, legolibrojn ktp. Ferenc Szilágyi enmigrinto el Hungario, redaktis kaj eldonis de 1955 ĝis sia morto en 1967 la kulturan revuon *Norda Prismo*. Ioman influon ekster la lando havis ankaŭ la revueto *Kvinpinto* (ekaperinta en 1960), la avangarda organo de la sveda sekcio de TEJO.

SEF okazigis ĝis 1972 66 landajn kongresojn. SAT — post siaj kongresoj en 1933 kaj 1951 en Stockholm — kunvenis en 1967 en Malmö.

En 1969 formiĝis provizora kunlabora komisiono, konsistanta el la prezidantoj de la Dana, Finna, Norvega kaj Sveda Landaj Asocioj, kiu celas intensigi la kunlaboradon de skandinaviaj Esperanto-asocioj kaj okazigi i.a. komunajn kongresojn de najbaraj landoj.

Membro de la Honora Patrona Komitato de UEA estas Björn Collinder, emerita profesoro pri finn-ugraj lingvoj en la Universitato de Uppsala.

15.2.31 Svislando

En 1902 estis fondita *Svisa Esperanto-Societo,* kiu seninterrompe funkcias ekde tiam ĝis hodiaŭ. Ĝi estis la dua landa Esperanto-societo post la franca, fondita en 1898. En la jaro 1903 komencis aperi la oficiala organo de SES *Svisa Espero,* kiu ankaŭ seninterrompe aperis, dum kelkaj periodoj presite, intertempe multobligite, nune ofsetpresite. La svisa esperantismo neniam fariĝis amasmovado, verŝajne pro tio, ke la Svisoj sentas la bezonon de internacia lingvo malpli ol aliaj popoloj. Homoj, kiuj parolas plurajn lingvojn (kaj la lingvoj parolataj kaj lernataj en Svislando estas ĉiam grandaj kulturlingvoj), estas proporcie pli multnombraj ol aliloke, kaj dank' al tio ili havas pli grandan facilecon en internaciaj rilatoj. Aliflanke kelkaj tre meritplenaj esperantistoj, kiuj ludis rolon en la internacia Movado, estas Svisoj; la plej elstara inter ili sendube estis Edmond Privat (1889—1962), honora prezidanto de UEA kaj emeninta verkisto. Daŭran meriton havas ankaŭ Hector Hodler, la fondinto de UEA. En tiu organizo, kiu havis sian centran oficejon en Ĝenevo ĝis 1947, ludis rolon ankaŭ Eduard Stettler, Hans Kürsteiner, Hans Jakob. La skismo UEA-IEL skuis la svisan Movadon, sed tamen ne splitis ĝin. Universalaj Kongresoj okazis en Ĝenevo en 1906 kaj 1925, en Bern en 1913, 1939 kaj 1947. Inter la svisaj eldonaĵoj menciindaj estas la germanlingva lernolibro de Esperanto de Jean Borel, kiu estis presita ekde 1904 en pli ol 100.000 ekzempleroj, kaj la *Svisa Antologio,* redaktita de Arthur Baur kaj eldonita de *Literatura Mondo* en 1939. En la lastaj 25 jaroj eble la plej grandan signifon por la internacia Movado havas la konstantaj radio-elsendoj de la Svisa Kurtonda Radio en Esperanto, kiuj okazas kvarfoje en la semajno. Ilin prizorgis de 1946—1962 Edmond Privat, de 1962—63 Charles Ecabert, de 1963—hodiaŭ Claude Gacond, kaj de 1947 ĝis hodiaŭ Arthur Baur. Aliaj menciindaj aktivadoj estas diversaj feriokursoj, regule organizataj en Svislando.

La interna Movado ricevis lastatempe novajn impulsojn per Kultura Centro Esperantista, kiun en 1969 fondis kaj nun plenokupe gvidas Claude Gacond. Sekve de lia iniciato, estis kreitaj ankaŭ Centro Edmond Privat kaj Centro de Dokumentado kaj Studo pri la Internacia Lingvo (CDELI), ambaŭ sub la zorgoj de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds.

15.2.32 Urugvajo

La unuan Esperanto-grupon fondis en 1905 Carlos Charrier, kaj en 1924 estis fondita *Urugvaja Esperanto-Societo* (UES). Grandan simpation por Esperanto inter la intelektularo postlasis la aktiveco de la elstara sciencisto Enrique Legrand, kiu estis plurfoje elektita kiel prezidanto de UES kaj pledis por Esperanto dum la Internacia Radio-Kongreso en Parizo (1925). Komence de 1926 en Montevideo okazis la Unua Sudamerika Esperanto-Kongreso, kiu naskis — ne longvivan — Sudamerikan Esperanto-Federacion. La morton de Legrand en 1936 sekvis periodo de stagnado, sed kun la helpo de eŭropaj enmigrintoj (E. Pfeffer, A. Klein, E. Sonnenfeld) iom progresis la aktiveco post la milito. Helpis tion la varba efiko de tradukoj, faritaj de Manuel Fernández-Menéndez, de *Ariel* kaj *Fermentario*, du ĉefverkoj de la urugvaja literaturo. La sama persono verkis ankaŭ krestomatian lernolibron dulingvan, *La Homo sur Sia Vojo* (1965).

De 1965 ĝis 1968 UES eldonis la fakan revuon *Kemio Internacia*, sub la redakto de Alberto Barrocas. La prezidanto de la Societo, Victor Luis Cao, instruas la lingvon en oficialaj institutoj. Aliaj kursoj okazas en YMCA kaj en liceo de la urbo Florida.

En 1954, okaze de la Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo, la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) de UEA, kunlabore kun Montevidea Esperanto-Societo, organizis la Unuan Universalan Ekspozicion de Esperanto. La aktivuloj de Urugvajo, precipe Prof. Fernández-Menéndez kaj Prof. V. L. Cao, donis grandan helpon al Prof. D-ro Ivo Lapenna, la observanto de UEA ĉe la Konferenco, kaj tiu kunlaboro kontribuis, almenaŭ parte, al akcepto de la konata rezolucio fare de la Ĝenerala Konferenco.

15.2.33 Usono

Ricevinte la franclingvan eldonon de la Unua Libro de Zamenhof, Henry Phillips, sekretario de la fama Amerika Filozofia Societo, tradukis ĝin anglen, verkis vortaron kaj eldonis la tuton en

Novjorko en 1889. Sed la plano de la Societo organizi internacian kunsidon pri la problemo de lingvo internacia fiaskis pro nesufiĉa interesiĝo de la invititaj sciencaj akademioj kaj pro la morto de Phillips en 1895.

Esperanta budo en la Monda Ekspozicio en St. Louis (1904) estis, laŭ opinio de Edmond Privat, kiu prelegis en Usono en 1907—08, la komencopunkto por Esperanto en Usono. En 1905 estis fondita la unua grupo en Boston, kie samjare estiĝis ankaŭ Amerika Esperantista Asocio; ekde sia Unua Kongreso en 1908 ĝi nomiĝas Esperanto-Asocio de Norda Ameriko (EANA). Kiel organo estis transprenita *Amerika Esperantisto*, fondita en 1906. En 1907 oni notis jam 82 grupojn en Usono kaj Kanado. Leĝo de la ŝtato Maryland permesis la enkondukon de Esperanto en lernejojn. Dum la 6-a Universala Kongreso en Washington, kiun oficiale ĉeestis dek unu registaroj kaj kvar usonaj ŝtatoj, Zamenhof entuziasme deklaris: „Lando de libereco, mi vin salutas!"

Kun la Unua Mondmilito komenciĝas longa periodo de stagnado por Esperanto en Usono, kaj ankoraŭ nun necesas batali kontraŭ bojkoto per silento. Aldoniĝis al tio, komence de la 1950'aj jaroj, la malutila influo de makartismo, lige kun kiu la direktoro de EANA, G. A. Connor, lanĉis denuncan kampanjon kontraŭ UEA. Sekvo de tio kaj de lia diktatora sinteno estis skismo en la nordamerika Movado en 1953, kiam fondiĝis *Esperanto-Ligo por Norda Ameriko* (ELNA). UEA akceptis ĝin kiel Landan Asocion kaj rompis ĉiajn rilatojn kun EANA.

Dum EANA praktike mortis, ELNA konsiderinde vigliĝis post ĉ. 1963, kiam estis fondita ankaŭ Junulara Esperantista de Nordameriko. La Ligo kongresas ĉiujare kaj eldonas internan bultenon kaj anglalingvan *Newsletter*. En 1965 komencis funkcii Esperanto-Inform-Centro (EIC), gvidata de Mark Starr, en Novjorko, kiu multe helpis en la prezentado de la propono de UEA al UN. Grava broŝuro de Prof. Mario Pei estis disdonita kaj vendita, ĉefe al bibliotekoj. Funkcias tri centroj por distribui Esperantan literaturon, en Novjorko, Kalifornio, Wisconsin. Kreskas la nombro de kursoj en lernejoj kaj kolegioj, fojfoje sub la gvido de eksterlandanoj (William Auld k.a.). Unuavice por bezonoj de turismo kaj komerco estis preparita lernolibro „Baza Esperanto".


Responde al demando de ELNA, la usona registaro kategorie neis, ke ĝi celas venkigi la anglan lingvon kiel mondan lingvon. Sed ke Usono devus dediĉi multe pli grandan atenton al la solvo de la lingva problemo, klopodas montri per sciencaj studoj la institucio *Esperantic Studies Foundation*, funkciigita en 1968 de kelkaj universitatanoj kiel centro por stimuli esplorojn pri la

lingvo, literaturo, historio kaj sociologio de Esperanto. Laŭ peto de la parlamentano Roman C. Pucinski, ĝi submetis en aŭgusto 1969 amplekse dokumentitan raporton *The American lag in solving the language problem* (La usona postrestado rilate solvon de la lingva problemo), kiu konklude konstatas, ke „la komunistaj registaroj elprovas, evoluigas kaj disvastigas unu internacian planlingvon, per internaciaj renkontiĝoj, radio-elsendoj kaj eldonaĵoj, dum Usono faras preskaŭ nenion por provi la eblecojn de tiu lingvo aŭ prezenti usonajn vidpunktojn al ĝiaj parolantoj ĉirkaŭ la mondo".

Superrigardo pri la stato de Esperanto en Usono ĉe la sojlo de la 57-a Universala Kongreso en Portland en 1972, la unua en la landego post la 11-a UK en Sanfrancisko en 1915, permesas pli da optimismo, ne ke la registaro pli fervore agos en la supre sugestita senco, sed ke la usona Esperanto-Movado per pli ampleksa kaj kvalita agado formiĝos kiel pli prestiĝa premgrupo por siaj celoj. Krom pli vasta instruado — en Havajo ĉiuj elementaj lernejoj instruas modestan Esperanto-lecionaron al infanoj en la kvara lerneja jaro en ĝenerala kurso pri komunikado — plej grava estas la aktiva apogo de respektataj universitatanoj. Interlingvistiko kaj esperantologio, ĝis antaŭ kelkaj jaroj apenaŭ priparolataj en Usono, nun fariĝis objektoj de sciencaj simpozioj aŭ temo de doktoriĝa disertacio (de Margaret G. Hagler pri *Esperanto kiel Literatura Perilo*).


15.2.34 Zairo

En tiu lando, antaŭe konata sub la nomo Demokratia Respubliko Kongo, estis fondita en 1963 *Konga Esperanto-Instituto*, kiu aliĝis al UEA en 1966. En la unuaj jaroj ĝi organizis kursojn precipe en la ĉefurbo Kinshasa, sed en 1970 Esperanto konatiĝis ankaŭ en Bukawu dank' al prelego antaŭ studentoj, kiun aŭspiciis la universitato kaj la guberniestro de Kiwu. Poste komenciĝis kursoj ankaŭ por junaj skoltoj, kies instruisto lanĉis Centron por la Disvastigo de Esperanto en Afriko.



Gvidantoj de Sovetrespublikara Esperantista Unio (ĉ. 1924), de maldekstre: Garašin, Ivanov, Nekrasov, Drezen, Valentinov kaj...? (nekonata).





15.3 LANDAJ ASOCIOJ AŬ INSTANCOJ NEALIĜINTAJ AL UEA

15.3.1 Ĉinio

Esperanto trovis eniron en Ĉinion komence de tiu ĉi jarcento en akompano kun la revolucia pensaro el Eŭropo. Ĉinaj anarkistoj ekeldonis en 1907 en Parizo la revuon *Hin Ŝi-gi* (Nova Jarcento), en kiu ili i.a. pledis por la ĝenerala enkonduko de Esperanto en Ĉinio, ĉar la skribosistemo kaj komplikeco de la ĉina lingvo ne konformas, laŭ ili, kun la bezono radikale modernigi la landon. Samtempe ankaŭ en anarkistaj rondoj en Tokio ĉinaj studentoj lernis Esperanton. En Ĉinio mem la unuaj kursoj ŝajne okazis en 1906 en Ŝanhajo kaj en 1908 en Kantono; jam en 1909 estis fondita (en Ŝanhajo) Ĥina Esperanto-Asocio.

En 1911—12, la jaroj de la revolucio, Kantono kaj Ŝanhajo funkciis kiel teritoriaj oficejoj de UEA; Caj juan-pej, nova Edukministro, dekretis la enkondukon de Esperanto en normalajn lernejojn. En Ŝanhajo establiĝis Ĥina Respublika Esperanto-Asocio. La kombinaĵo „Esperanto kaj anarkismo" nun povis esti praktikata ankaŭ en la lando mem: inter la unuaj socialismaj revuoj estis (en 1913) *La Voĉo de la Popolo*, prizorgata de Sifo (1884—1915) kaj Wong Kenn (1894—), kaj *Ĥina Socialisto*. Ili ambaŭ aperis parte en Esperanto. Pluraj aliaj revuoj portis esperantlingvan subtitolon. Sifo krome iĝis en 1913 delegito de UEA en Kantono, fondis grupon kaj baldaŭ arigis 300 esperantistojn.

Sed reakcia ondo ekde la sama jaro verŝis suspekton ankaŭ sur la junan Esperanto-Movadon, kiu regajnis pozicion nur lige kun la Kultura Revolucio de 1919. Jam antaŭ tio, la lingvisto Kian hjuan-tong (1887—1939) neis, ke la orientaj lingvoj taŭgas por sciencaj celoj; laŭ li, sekve necesas alpreni Esperanton anstataŭ la ĉina. Pri tiu ĉi demando leviĝis vigla diskuto inter elstaraj ĉinaj intelektuloj, kiuj — kvankam ne ĉiuj partoprenis la pesimismon pri la perspektivoj de la ĉina lingvo — ĝenerale alte respektis Esperanton.

En 1921, tutlanda konferenco de edukistoj adoptis proponon favore al Esperanto kaj petis pli vastan aplikon de la dekreto de Caj, kiu, nun rektoro de la Pekina Universitato, invitis la Ruson V. Eroŝenko instrui Esperanton en deviga kurso, altiranta 500—600 studentojn. En 1922 okazis nacia Esperanto-kongreso en la Universitato kun ĉ. 2.000 partoprenantoj. En 1923 estis fondita Pekina Esperanto-Kolegio.

15.3 LANDAJ ASOCIOJ AŬ INSTANCOJ NEALIĜINTAJ AL UEA

Hujucz (1897—), unu el la ĉefaj aktivuloj tra kvin jardekoj, fondis en 1920 societon en Ŝanhajo. Ankaŭ tie Esperanto estis instruata en la universitato (kaj en kelkaj mezlernejoj), aperis *La Verda Lumo* (1922—33) kaj dek sep kajeroj de Koresponda Esperanto-Kurso (1926).

Ankaŭ eksterlande la registaro vidigis sian simpation al Esperanto: en pluraj internaciaj Esperanto-kongresoj kaj -konferencoj partoprenis oficialaj senditoj, i.a. Caj persone en la 14-a Universala Kongreso en Vieno (1924). La ĉina ĉefdelegito ĉe Ligo de Nacioj, Wellington Koo, multe influis la favoran pritrakton de Esperanto. En 1925, Wong Kenn fariĝis membro de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado.

Sekve de la fondo de Kantona Esperanto-Instituto, en 1926, malfermiĝis kursoj en du universitatoj kaj dek tri aliaj lernejoj de Kantono. El la kvar centroj, en Ŝanhajo, Kantono, Hankoŭ kaj Pekino, Ŝanhaja Esperanto-Asocio baldaŭ okupis la unuan lokon per sia granda biblioteko, bona organizo kaj sistema laboro. Kvankam ĝia tuta oficejo perdiĝis en cindro pro japana atako en 1932, ĝi restis aktiva ĝis la militeksplodo en 1937, i.a. eldonante la grandformatan revuon *La Mondo*. Aparte notinda estas la aktiveco de ŝanhajaj esperantistoj (Je laj-ŝi k.a.) en la skribreforma movado. La novan latinalfabetan sistemon Latinxua, kompilita en Soveta Unio, ili unuafoje konatigis en la lando per traduko de esperantlingva artikolo pri ĝi el *La Nova Etapo* (1932), kaj la samaj fondis en 1934 la unuan grupon de apogantoj de la sistemo. Ne nur Latinxua, sed ankaŭ Esperanto trovis la subtenon de la elstaraj verkistoj Lusin, Guo mo-ĵuo, Bakin (mem esperantisto), Maŭ dun k.a. kaj de Maŭ ze-dong, kiu deklaris en 1939: „Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucian, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata."

Sub la devizo „Per Esperanto por la Liberigo de Ĉinio", la esperantistoj tre vigle uzis sian lingvon por denunci la japanan imperiismon, aperigante dum la milito tri revuojn *Voĉoj el Oriento*, *Orienta Kuriero* kaj *Heroldo de Ĉinio*, kiuj trovis legantojn en pli ol 850 urboj de 63 landoj. Same, la registaro eldonis esperantlingvajn broŝurojn, i.a. paroladon de Ĉiang kaj-ŝek. Dume tamen oni ne neglektis la disvastigon de Esperanto en Ĉinio mem; Koresponda Lernejo en Ĉongking varbis pli ol 2.000 lernantojn de 1939 ĝis 1942.

En aŭgusto 1949 ree funkciis Ŝanhaja Esperantista Ligo, aperigante la revuon *Popola Mondo;* trifoje semajne estis radioprogramo pri Esperanto. Ŝtata eldonejo komencis eldoni en majo 1950 la revuon *El Popola Ĉinio,* kiu — kun interrompo en 1954—56 — aperas ĝis

nun. Post tri malsukcesaj provoj pri tutlanda organizaĵo (1937, 1938 kaj 1945), la 11-an de marto 1951 okazis en Pekino la fonda kongreso de Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL). Prezidanto fariĝis Hujucz, estro de la Eldona Administracio kaj ekde 1959 Vicministro de Kulturo. Ĉinaj sciencistoj publikigis en 1951 deklaron por la apliko de Esperanto en scienco, kaj en 1952 aperis preskaŭ 1.000-paĝa *Plena Vortaro Esperanta-Ĉina*. En 1956 ĈEL unuafoje sendis delegitojn al Universala Kongreso, en 1957 ĝi reprezentiĝis dum la Junulara Festivalo en Moskvo. Interna bulteno estis distribuita al 1.500 personoj, kaj studogrupoj formiĝis en la Universitatoj de Pekino kaj Tiangin. Rapide elĉerpiĝis novaj lernolibro kaj vortaro (1958—59). Hujucz kaj Je laj-ŝi (nun vicprezidanto de ĈEL) iĝis en 1961 vicprezidantoj de la Ŝtata Komitato por Skriblingva Reformo.

Ekde 1963 (kiam okazis tutlanda konferenco de ĉinaj esperantistoj en Pekino) pluraj universitatoj kaj fremdlingvaj institutoj enkondukis Esperanton; kreiĝis ankaŭ Ŝtata Seminario por Esperanto-Instruistoj. En 1964 troviĝis Esperanto-katedroj en dek unu altlernejoj en ses grandurboj, aperis oficiala filmo „Brila Festotago" kaj komenciĝis elsendoj de Radio Pekino.

Dum la Proleta Kultura Revolucio ŝajne la instruado de la Internacia Lingvo estis ĉesigita, sed aliflanke *El Popola Ĉinio* duobligis la oftecon de sia aperado, elirante nun ĉiumonate kun po 50-70 paĝoj, kaj daŭris la seninterrompa eldonado de verkoj de Maŭ kaj aliaj politikaj broŝuroj en Esperanto; neniu alia ŝtato uzas tiun lingvon pli intense ol Ĉinio. La principojn de sia agado substrekis ĈEL per jena deklaro (1968): „... ekzistante disde la liberiga batalo de la subprematoj nacioj kaj popoloj, disde la batalo por la venko de socialismo tra la tuta mondo, Esperanto ne havas perspektivon."

15.3.2 Germana Demokratia Respubliko

La fonda kunsido de „Centra Laborrondo de Esperanto de Germana Demokratia Respubliko" (CLR) okazis en Berlino la 31-an de marto 1965. Ĝi akceptis direktivojn por la estonta agado de esperantistoj en la kadro de Germana Kultur-Ligo, kies sekcio ĝi estas. Hodiaŭ CLR konsistas el 29 membroj. Sekvis la fondo de Distriktaj Laborrondoj kaj Subdistriktaj Laborgrupoj, kiuj kune ampleksas ĉ. 1.600 personojn. Por eduki gvidantojn — post preskaŭ tridek jaroj de neoficiala Esperanto-Movado — estis ĝis nun aranĝitaj kvar seminarioj, traktantaj temojn pri politiko, instruado de Esperanto, historio de la laborista Esperanto-Movado kaj inter-

lingvistiko. Krome, regule okazas distriktaj renkontiĝoj kaj kunvenoj dum la Internacia Foiro en Leipzig. La unuan tutrespublikan renkontiĝon, fine de septembro 1970 en Karl-Marx-Stadt, partoprenis 200 delegitoj.

En scienca eldonejo aperis lernolibro (1967) kaj vortaroj Esperanta-germana (1967) kaj germana-Esperanta (1971). Krom ĉiujara luksa numero de *Paco* estis eldonitaj i.a. ankaŭ informaj libroj pri la dudekjara jubileo de GDR (1969) kaj pri la kleriga sistemo (1970). La organo de CLR estas *der esperantist.*

Aparte flegata estas la esplorado de la historio de Germana Laborista Esperanto-Asocio, kiu agis inter la militoj kaj estis fine multe pli forta ol la neŭtrala GEA. Ties tradicion intencas daŭrigi CLR. La laborista Esperanto-Movado estis aparte aktiva sur la teritorio de nuna GDR, precipe en Leipzig, kie okazis en 1929 la 9-a SAT-Kongreso kaj troviĝis (ĝis 1933) administra centro de SAT kaj la eldonejo EKRELO, kaj en Berlino, kie en 1932 estis fondita Internacio de Proletaj Esperantistoj.

15.3.3 Gvatemalo

Gvatemala Esperanto-Asocio (GEA) estis fondita en 1952.

En 1958, la prezidantino de GEA, Consuelo de Sánchez-Latour, aperigis dulingvan, pli ol 500-paĝan libron, *Esperanto tra la Mondo,* kiu prezentas kolekton de artikoloj pri Gvatemalo, pri Esperanto kaj ĝia utiligo dum ŝiaj vojaĝoj.

En 1963, la registaro permesis al GEA eksperimentan instruadon de la Internacia Lingvo dum tri jaroj en duagradaj lernejoj. Rezultoj ne estas konataj.

15.3.4 Hinda Unio

Jam en 1909 oni registris Esperanto-grupojn en Kalikato, Bombajo, Surat, Ahmedabad, Agra, Allahabad, Jetpur kaj Travankore, kaj ankaŭ Esperanto-Societon de Hindujo, sed ĉiuj ĉi ne havis longan vivon.

Nur en 1957—58 Esperanto iomete ekdisvastiĝis en la vasta hinda subkontinento, i.a. dank' al la helpo de senditoj de UEA, Tibor Sekelj kaj precipe Madeleine Haudebine. Estis fonditaj grupoj en Delhio, Kalikato, Bombajo kaj Madras, el kiuj la du lastaj baldaŭ dissolviĝis. Efemere vivis en 1958—59 Sudazia Esperanto-Federacio.

Hinda Instituto de Esperanto estis fondita en februaro 1962, unue por aranĝi elementan ekzamenon por la lernintoj de s-ino Haudebine. Pro manko de monrimedoj ĝi laboras nur sporade, povante

nur nesufiĉe diskonigi sian korespondan kurson. En decembro 1966 ĝi okazigis la unuan Hindan Kongreson de Esperanto, kaj en 1967 ĝi eldonis *Utila Manlibro pri Hindujo* verkitan de M. Haudebine.

En 1963 estis fondita Bengala Esperanto-Instituto, kiu kolektis kaj disponigis al Hinda Nacia Biblioteko en Kalikato ĉ. 500 Esperantajn librojn. Per subvencio de UEA ĝi eldonis bengalan ŝlosilon kaj bengallingvan informlibreton (1963). Gvidanto de la Instituto estas Lakshmiswar Sinha, kiu lernis Esperanton antaŭ la milito en Svedio. En 1966 Esperanto-ekspozicio en la fama universitato de Ŝantiniketan allogis 7.000 vizitantojn.

En diversaj monaĥejoj de Kerala la jezuita patro Henry Joseph jam ekde 1937 instruas Esperanton al seminariistoj.

Favoraj juĝoj pri la Internacia Lingvo estas konataj de Mahatma Gandhi, de lia disĉiplo Vinoba Bhave kaj de Rabindranath Tagore.

15.3.5 Islando

En 1893 aperis la unua islanda gazetartikolo pri Esperanto, en 1909 Thorsteinn Thorsteinsson eldonis la unuan lernolibron por Islandanoj, sed la ĉefa pioniro estis Thórbergur Thórdarson, konata verkisto kaj socialisto, kiu, lerninte Esperanton en 1925, okazigis kursojn laŭ la Cseh-metodo (i.a. en radio) kaj vojaĝis al Soveta Unio per Esperanto. Sekve de lia influo, islandaj socialistoj donis multan apogon al la Internacia Lingvo. Esperanto-societo en Reykjavík estis fondita en 1927.

Koresponda Esperanto-kurso lanĉita en 1944 trovis centojn da lernantoj. Post la milito, propono de la Socialista Partio pri deviga enkonduko de Esperanto en gimnaziojn estis malakceptita per diferenco de nur du voĉoj.

La 1-an de januaro 1949 la tri lokaj kluboj de la insulo starigis inter si Federacion de Islandaj Esperantistoj, kiu en septembro 1950 aranĝis sian unuan kongreson en la Universitato de Islando.

En la jaroj 1949—50 kaj 1959—60 aperis altnivela revuo *Voĉo de Islando*, kiu prezentis — same kiel la islandaj numeroj de *Paco* — perlojn de la islanda literaturo. Kultura Fondaĵo eldonis en 1961 informan libreton *Faktoj pri Islando*.

La Islandano Baldur Ragnarsson fariĝis respektata originala verkisto, kaj al Baldvin B. Skaftfell oni dankas *Islandan-Esperantan Vortaron* (1965), 479-paĝan, kiu apartenas al la plej bonaj nacilingvaj-Esperantaj vortaroj.

15.3 LANDAJ ASOCIOJ AŬ INSTANCOJ NEALIĜINTAJ AL UEA

15.3.6 Kolombio

Kvankam Esperanto ekde sia unuafoja apero en Kolombio trovis tie ĉiam favoran akcepton en kulturaj rondoj (la unuan „Ligon de Kolombiaj Esperantistoj" patronis en 1911 la Prezidento de la Respubliko), konstanta kaj sistema agado komenciĝis nur lastatempe, sub la prizorgo de Kolombia Esperanto-Ligo fondita en 1966. Ĝi havas nun ĉ. 500 membrojn, kun du ĉefaj lokaj centroj: Bogotá kaj Cartagena. En 1968 aldoniĝis junulara sekcio („KolombEJO"), kiu okazigas kursojn en la universitato. Nova klubo en la urbo Medellín organizis en 1971 korespondajn kursojn.

15.3.7 Koreo Norda

Korea Esperanto-Asocio (KEA) estis fondita en aprilo 1959; la estraron eniris i.a. kiel prezidanto Song bong-ug, Ministro pri Financoj, kaj kiel vicprezidantoj la rektoro de la Medicina Universitato kaj la direktoro de la Ŝtata Teatro de Nacia Arto. La unuajn du kursojn post la fondiĝo de KEA partoprenis pli ol 650 personoj.

Esperanto-Korea Vortaro aperis en 1964. Radio Pjengjang dum kelkaj jaroj havis elsendojn en Esperanto.

15.3.8 Libano

Pioniro de Esperanto en tiu lando estis la Dano D-ro Paul Neergaard, kiu instruis la lingvon dum restado kiel gastprofesoro en la Amerika Universitato de Bejruto. El tio sekvis en 1961 la fondo de Libana Esperanto-Asocio, kiu celas helpi la disvastigon de Esperanto ankaŭ en aliaj arabaj landoj. Prezidanto estas la psikologo kaj verkisto Prof. D-ro Salah Ghanem.

Laŭ decido de la Ministerio pri Turismo en 1970, oni planas eldoni turismajn informilojn en Esperanto, instrui la lingvon al gvidistoj kaj inviti Universalan Kongreson.

15.3.9 Luksemburgo

Luksemburga Esperanto-Asocio estis fondita fine de 1971 kaj havas proksimume 100 membrojn. Kune kun la Landaj Asocioj en FR Germanio, Belgio kaj Francio, ĝi organizis en 1973 plurnacian Eŭropan Esperanto-Kongreson en Luksemburgo.

15.3.10 Malto

En 1901 la malta nacia poeto Dun Karm (1871—1961) verkis esperantlingvan poemeton, kiu verŝajne restis lia sola en tiu lingvo. Kelkaj grupoj de esperantistoj troviĝis en Malto jam antaŭ la Unua Mondmilito, sed nur fine de 1961 estis fondita Malta Esperanto-Societo (MES) kun 15 membroj. En la sekvantaj jaroj ĝi plurfoje aperigis artikolojn pri Esperanto en la gazetaro. En 1965 estis anoncita internacia Esperanto-konkurso pri la 400-jara datreveno de la Granda Sieĝo Malta; kun helpo de la Turisma Oficejo, MES transdonis al la gajnintoj diplomojn kaj arĝentajn donacojn.

Pro siaj tradukoj el malta literaturo, la prezidanto de MES, Carmel Mallia, estis premiita en la Belartaj Konkursoj de 1966 ĝis 1968.

15.3.11 Meksikio

Lulilo de Esperanto en Meksikio estas la urbeto Necoxtla (nun Mendoza), en kiu la Franco Anselmo Morin fondis en 1903, kune kun Ambrosio Vargas, Meksikan Societon por Propagando de Esperanto. Ĝis 1910, kiam eksplodis la revolucio, la Movado kontentige progresis.

En 1926 estis fondita Esperanta Meksika Societo. Kursoj okazis en diversaj lernejoj, en du radiostacioj kaj en „Tutmonda Instituto de Nepersona Vivo". De 1935 ĝis 1947 aperis en Meksiko la „revolucia gazeto" *Renovigo*. En 1939—40 alvenis kiel rifuĝintoj pluraj eŭropaj esperantistoj, i.a. la Hispanoj Azorin kaj Mangada kaj la SAT-fondinto Lanti, kiuj komencis helpi la enlandan Movadon.

En 1950 estis fondita Esperanta Meksika Asocio (EMA), sed nur fine de 1962 ĝi sukcesis organizi sian unuan kongreson, pri kiu radio, gazetaro kaj televido amplekse raportis — same pri la sekvantaj ĝis 1965. EMA stagnas depost 1967.

Reaktiviĝo ŝuldiĝas i.a. al la TEJO-sekcio, Esperanta Meksika Junularo, kiu per granda kampanjo atentigis pri la lingva problemo dum la Olimpiko, rikoltante multe da simpatio ĉe la gazetaro kaj pluraj sportistoj.

15.3.12 Mongolio

La unuaj kursoj en Mongola Popola Respubliko okazis jam en 1933. Ilin gvidis Yöngsiyebu Rinĉen, tiutempe estro de la Lingvistika Sekcio de Scienca Komitato ĉe la Ministerio pri Klerigo kaj

hodiaŭ membro de Mongola Akademio de Sciencoj. Filologo, etnografo kaj folkloristo, li estas konsiderata kiel la internacie plej konata vivanta Mongolo. Tridek jarojn post tiu unua paŝo Rinĉen komencis refoje agadi por Esperanto. Aperis de li Esperanto-mongola vortaro (1964) kaj lernolibro (en du eldonoj, 1964 kaj 1966). Rezulte de pluraj kursoj, pri kiuj interesiĝas precipe gejunuloj, en decembro 1970 estis fondita, kiel naŭa landa asocio en Azio, Mongola Esperanto-Unuiĝo.

Prof. Rinĉen tradukis mongolen kelkajn fabelojn de Andersen laŭ la Esperanta traduko de Zamenhof.

15.3.13 Portugalio

La sorto de la Esperanto-Movado en Portugalio estas karakterizita per konfuza alternado de permesoj kaj malpermesoj. La unua lernolibro aperis tie en 1896; en 1909 estis fonditaj la unuaj grupoj en Lisbono kaj Porto, kaj la registaro tiutempe eĉ favoris la Movadon.

En la 20'aj jaroj, precipe de 1927 ĝis 1930, estis tre vigla laborista Esperanto-Movado, sed la neŭtrala Portugala Esperanto-Asocio, fondita en 1924, spertis malfacilaĵojn, ĉar militistoj okupis la domon de framasonoj, en kiu troviĝis ĝia sidejo. PEA reviviĝis en 1932, sed en aŭtuno 1936 subite ĉiuj Esperanto-societoj estis police fermitaj pro „kontraŭregistara aktiveco". Dum la milito (kiu ne tuŝis Portugalion) denove povis funkcii Portugala Esperanto-Ligo kaj aperis popularsciencaj broŝuroj en Esperanto, sed en 1948 la malpermeso estis renovigita. Por pligrandigi la konfuzon, en 1951 restariĝis Landa Asocio, kies statuto fine, en marto 1952, ne estis akceptita. Dum la sekvantaj jaroj ĉio, kio aspektis esperantlingva, estis konfiskita.

La situacio iom, kvankam ankoraŭ ne draste, ŝanĝiĝis post la mildigo de la cenzuro: en 1967 aperis, de pseŭdonima aŭtoro, libro pri Esperanto; en 1968 la Societo de Portugala Lingvo starigis Esperanto-fakon, kaj aperis gazetartikoloj pri la Internacia Lingvo.

Jorge de Saldanha-Carreira (1887—1970), Honora Membro de UEA kaj dum multaj jaroj kvazaŭ la personigo de Esperanto en Portugalio, ne plu povis ĝisvivi la sukceson de sia multjara batalo por laŭleĝigo de organizita Movado: en 1972, fine, povis esti refondita Portugala Esperanto-Asocio, kiu eldonas ekde junio 1973 la monatan organon *Revista Portuguesa de Esperanto.*

15.3.14 Rumanio

Kvankam la unua vortareto por Rumanoj aperis jam en 1889, Esperanto-Movado naskiĝis nur en 1907, kiam, tri jarojn post la unua kurso (de H. Fischer-Galati) kaj la unua grupfondiĝo, estis starigita Rumana Esperantista Societo (RES) per la klopodoj de bakteriologo Gabriel Robin (1869—1911); li organizis ankaŭ kongreson en 1909 kaj fondis la gazeton *Danubo* en 1910, kiu ĝis 1912 servis kiel komuna organo al rumanaj kaj bulgaraj esperantistoj.

La militajn perturbojn sekvis en 1922 periodo de vigla aktivado por Esperanto, dum kiu miloj partoprenis kursojn kaj okazis ses landaj kongresoj. Andreo Cseh, kiu en printempo 1920 ellaboris sian faman instrumetodon, fondis Rumanan Esperanto-Instituton. Sed depost 1928, lige kun la ekonomia krizo, la Movado stagnis, kaj, aldone al tio la lingvo kaj ideo de Esperanto estis konsideritaj kiel kaŝa organizado de la Komunista Partio. Konataj esperantistoj kiel Cseh, T. Morariu, S. Pragano kaj Fischer-Galati forlasis la landon.

Post la milito baldaŭ kreiĝis organizaĵoj en dek urboj kaj kvin urbetoj, subtenataj i.a. per rekomendo de la sindikatoj. En 1947 RES estis unuafoje jure rekonita, la gazetaro montris grandan simpation al Esperanto, denove estis kunlaboro kun Bulgaroj (en Balkanlanda Kontakta Komitato), sed apenaŭ du-tri jarojn poste ĉia organizita agado ĉesis. La paŭzo daŭris en Rumanio pli longe ol en aliaj orienteŭropaj landoj, kvankam fine de 1956 stariĝis Iniciata Komitato por Esperanto, kiu instigis formadon de grupoj en tridek urboj kaj aranĝis sepdek publikajn kursojn kun pli ol 2.000 kursanoj; la Instituto por Lingvoscienco kaj la Akademio de Rumana Popola Respubliko skribe agnoskis la utilon de Esperanto. Tiu ekfloro denove pasis, verŝajne ĉefe sub la influo de la lingvisto kaj akademiano Alexandru Graur, kiu atribuis al Esperanto en 1960 „neniun avantaĝon".

Tamen la esperantistoj plue organizis kursojn en privata kadro kaj grandnombre partoprenis en la Universalaj Kongresoj de Sofio kaj Budapeŝto. Fine, en 1969, ili atingis oficialan aprobon, laŭ kiu esperantistoj povas kunveni kaj aranĝi kursojn en la lokaj kulturdomoj. En aŭgusto 1970 estis starigita Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato, kiu celas „kunordigi la agadon de la Esperanto-rondoj funkciantaj ĉe kulturdomoj", sed ne estas oficialigita de ŝtataj instancoj. Kvankam la Komitato organizas renkontiĝojn kaj dissendas ĉiumonate internan informilon al ĉ. 1.500 personoj, la pluan disvastigon de Esperanto antaŭ ĉio malhelpas la manko de lernolibroj kaj vortaroj kaj la ofte malfavoraj artikoloj en la rumana gazetaro.

15.3 LANDAJ ASOCIOJ AŬ INSTANCOJ NEALIĜINTAJ AL UEA

15.3.15 Senegalo

En januaro 1970 estis fondita Senegala Komitato por Esperanto, kaj en la sama monato komenciĝis Esperanto-kurso en la Afrika Kultura Centro en Dakaro. Pri nova koresponda kurso atentigis la Ministerio de Nacia Edukado per oficiala cirkulero al la lernejoj de la lando.

15.3.16 Soveta Unio

La Unua Libro de „D-ro Esperanto" aperis en la rusa lingvo, (kaj estis permesita de la rusa cenzuro), la unuaj esperantistoj estis ruslandanoj (en la Unua Adresaro, el la unua milo, pli ol 800 estis Rusoj), kaj ĉiuj historiistoj de Esperanto akcentas la gravan rolon, kiun ludis Rusoj en la evoluigo de la Esperanta literaturo kaj idearo ligita al la lingvo. Sed la ĝenoj de la cara burokratismo longtempe malebligis tutlandan organiziĝon: laŭleĝe povis funkcii nur la societo „Espero" en Peterburgo, starigita en 1892. Pro artikolo de Tolstoj en *La Esperantisto*, inter 1895 kaj 1905 ne povis aperi eĉ unu nova eldonaĵo. Nur la unua rusa revolucio permesis pli liberan aktivadon, tiel ke en 1908 estis fondita Ruslanda Ligo Esperantista, kiu havis en 1911 ĉ. 900 anojn. En la sama jaro ĝi devis dissolviĝi, post kiam ĝia prezidanto A. A. Postnikov estis arestita pro „spiona agado". En 1909 A. A. Saĥarov iniciatis eldonejon „Esperanto" en Moskvo kaj la gazeton *Ondo de Esperanto*. La unuaj kongresoj okazis en Peterburgo (1910) kaj Kievo (1913). Aliflanke, ankoraŭ komence de 1917 presado de Esperanta gazeto en Peterburgo estis malpermesita.

Post la Oktobra Revolucio, malgraŭ la daŭranta milito kaj internaj streĉiĝoj, oni registris ne malpli ol 100 Esperanto-societojn en Ruslando, kiuj kune eldonis proks. saman nombron da bultenoj. Sed disbloviĝis la espero, ke la nova registaro forte antaŭenpuŝos la Movadon, ĉar la kruda realaĵo postulis aliajn prioritatojn (kvankam kelkaj lokaj aŭtoritatoj esprimis sin favore al la Internacia Lingvo).

Nur en 1921, dum la 3-a Tutruslanda Kongreso en Petrogrado, estis proklamita la fondo de Sovjetlanda Esperantista Unuiĝo (Sovetrespublikara Esperantista Unio: SEU), kiu kvar jarojn poste, kiam la aŭtoritatoj deklaris la bezonon de internacia eduka laboro por la laboristaj amasoj, komencis ricevi fortan subtenon de ŝtataj, partiaj kaj sindikataj institucioj. Tio aparte sentiĝis okaze de la 6-a SAT-Kongreso en Leningrado (1926). Dum la 4-a Kongreso de

SEU en Moskvo (1928) E. K. Drezen iĝis nekontestata gvidanto de SEU kaj submetis tezaron pri kolektiva kreo kaj evoluo de la lingvo internacia.

La 5-a Kongreso de SEU en Moskvo (1931) konfirmis la intertempe realiĝintan skismon kun SAT. En la sama jaro la Moskva Instituto de Lingvoscienco adoptis detalan rezolucion pri la perspektivoj de internacia lingvo.

Atinginte preskaŭ 10.000 membrojn, eldoninte pli ol 200 librojn kaj plurajn revuojn, rompinte la kompromitajn ligojn kun „kontraŭsoveta" SAT, subite en 1937 SEU estis dissolvita; ĝiaj ĉefaj gvidantoj estis mortigitaj, nekonata nombro da membroj estis arestita.

La unuaj kontaktoj de sovetaj esperantistoj kun eksterlando rekomenciĝis en 1952 — ankoraŭ tre sporade ĝis 1955, kaj nur kun esperantistoj en popoldemokratioj. Kun atento oni notis, ke la soveta delegitaro ne voĉdonis kontraŭ (sed sindetenis pri) la decido de Unesko rekoni la kulturan valoron de Esperanto. Helpe de MEM stariĝis — oficiale kaj neoficiale — „Esperantistaj Pacrondoj" en diversaj urboj. Sub la prezido de la vicdirektoro de la Lingvoscienca Instituto de Scienca Akademio de USSR, E. A. Bokarev (1904—71), formiĝis Iniciativa Grupo de Sovetuniaj Esperantistoj, kiu celis prepari la fondon de asocio — iom antaŭ la 20-a Kongreso de KPSU (1956). Sub aŭspicioj de Erevana Ŝtata Universitato formiĝis ankaŭ, en majo 1957, Armena Organiz-Komitato Esperantista. Kuraĝige efikis la Esperanto-renkontiĝo dum la 6-a Tutmonda Festivalo de Junularo en Moskvo (1957), kaj post dudek jaroj aperis, en Leningrado, la unua esperantaĵo, lernolibreto de N. D. Andreev, kiu — same kiel estona lernolibro — tuj disvendiĝis.

Plue mankis ĉia oficiala apogo; aperigo de *Armena Esperantisto*, kies unusola numero eliris en 1958, estis malpermesita. Aliflanke, neniu malhelpis multnombran partoprenon en Esperanto-kursoj en ĉiuj partoj de Soveta Unio kaj la ricevon de revuoj kiel *Paco* aŭ *Nuntempa Bulgario*. La gazetaro ne plu sisteme prisilentis la lingvon, sed — precipe en la baltaj respublikoj — ne malfavore raportis pri la Movado. Bona lernolibro por Litovoj aperis en 1959.

Ekde 1959 ĉiujare okazis someraj tendaroj en Estonio, Latvio kaj Litovio, kiujn partoprenis ankaŭ multaj esperantistoj el aliaj respublikoj; ili multe aktivigis la baltlandan kaj sovetan Movadon, bremsatan pro manko de tutlanda centra organizaĵo. Kutime la esperantistoj agis surloke en la kadro de sindikataj kluboj kaj kulturdomoj. Aktiva centro en Moskvo estis dum kelkaj jaroj la Esperanto-societo en la tiea Domo de Medicinistoj. En 1961 aperis nova lernolibro por Rusoj (de I. V. Sergeev), sed ankaŭ ĝia el-

15.3 LANDAJ ASOCIOJ AŬ INSTANCOJ NEALIĜINTAJ AL UEA

donkvanto neniel kontentigis la interesiĝon.

En 1963, unuafoje post pli ol kvaronjarcento, oficiala delegitaro de sovetaj esperantistoj vojaĝis eksterlanden — al la 48-a Universala Kongreso en Sofio (ekde tiam ili estis reprezentitaj en ĉiu UK), kaj samjare ekaperis serio da ofsetaj broŝuroj (i.a. la kajeroj *Por la Paco*). Ĉe „Unio de Sovetaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj", kiu eldonis tiujn broŝurojn, formiĝis en 1965 „Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj", prezidata de Bokarev. Ĝis certa grado ĝi anstataŭas landan asocion.

En 1966 aperis en kvanto de 50.000 ekzempleroj 536-paĝa *Rusa-Esperanta Vortaro* de Bokarev. En oktobro 1966 okazis solena fonda kunveno de Esperanto-Klubo en la Universitato de Moskvo. En marto 1967 la Prezidanto de UEA, Ivo Lapenna, prelegis antaŭ Esperanto-grupoj en Moskvo kaj Leningrado.

Laŭ oficiala informo el Moskvo (1968), en la Instituto de Lingvistiko estis establita speciala interlingvistika sekcio; Esperanto estas pristudata ankaŭ de Soveta Akademio de Sciencoj; ekzistas sub-sekcio pri Esperanto en Konsilo pri Cibernetiko. En verko de E. Svadost, *Kak vozniknet vseobŝĉij jazyk?* (Kiel estiĝos tutmonda lingvo?), 1968, la teorioj pri tutmondiĝo de nacia lingvo kaj kunfandiĝo de ĉiuj lingvoj post tutmonda enkonduko de socialismo estas forlasitaj; la aŭtoro konkludas, ke la mondolingvo estos — ankoraŭ kreota — planlingvo.

En 1969 stariĝis Soveta Esperantista Junulara Movado kiel libervola unuiĝo de la reprezentantoj de junularaj kluboj (pli ol 50); ĝi transprenis i.a. la organizadon de la tradiciaj Junularaj Tendaroj (la 12-a okazis en 1970), kontaktas Komsomolon kaj kunlaboras kun TEJO. Intertempe, laŭ la modelo de la Komisiono en Moskvo, establiĝis similaj komisionoj ankaŭ en kelkaj respublikoj: en Armenio (1965), Uzbekio (1966), Litovio (1967), Ukrajno (1968), Latvio (1969), Estonio (1969) kaj Kartvelio (1970). Oni taksas, ke Esperanto-kluboj aŭ rondetoj troviĝas en ĉ. 600 lokoj.

La registaro de Litovio decidis en aprilo 1969 ebligi la instruadon de Esperanto en mezgradaj lernejoj kiel fakultativa objekto, dum 1½ horoj semajne. Unue komencis instrui 19 lernejoj. Oficiala broŝuro de la Edukministerio klarigis, ke Esperanto estas „la plej rapide lernebla el ĉiuj lingvoj de la mondo" kaj ke ĝi donas bonan bazon al la posta lernado de aliaj lingvoj. Plia signo de la laŭgrada plifavoriĝo de la oficiala sinteno al Esperanto en Soveta Unio estis la decido ankaŭ de la Estona Ministerio de Klerigo enkonduki, ekde septembro 1969, la instruadon de Esperanto en la okaj klasoj de la lernejoj, kondiĉe ke troviĝu kompetenta instruisto kaj ke minimume 15 lernantoj elektu la kurson. En ambaŭ respublikoj

okazis en somero 1970 oficialaj Esperanto-kursoj por instruistoj, kiujn organizis la respektivaj Institutoj por Perfektigo de Pedagogoj. Baldaŭ poste, similajn paŝojn decidis fari ankaŭ la Eduka Ministerio de Latva SSR.

Esperantajn elsendojn ofertas Radio Tallinn. Notindaj periodaĵoj estas ĉiujara, ampleksa numero de *Paco*, krome *Tra Soveta Ukrainio, Soveta Uzbekistano* kaj *Horizonto de Soveta Litovio*.

15.3.17 Tanzanio

Tanzania Esperanto-Asocio, kun 20 membroj, estis fondita en 1963. En septembro 1968 Radio Tanzania unuafoje elsendis pri Esperanto, nome svahillingvan intervjuon kun la prezidanto de TEA, Pascal V. X. Sao, kiu revenis de unujara studrestado en Svedio.

15.3.18 Venezuelo

Venezuela Esperanto-Asocio estis fondita en 1951, sed ne kolektis ĝis nun konsiderindan membronombron.

En 1959, ĉiusemajne en la plej grava ĵurnalo de la lando aperis informoj pri Esperanto. Komence de 1963 ekfunkciis en la Universitato de Caracas baza kurso de Esperanto, organizita de la Fako de Ĝeneralaj Studoj de la Direkcio de Kulturo.

15.3.19 Vjetnamo Norda

Vjetnamanoj ekinteresiĝis pri Esperanto ekde la jaroj 1929—30, en la periodo de franca superregado, per la enkonduko de franca laboristo, André Guérineau, kiu travojaĝis Eŭropon kaj Azion per biciklo por propagandi la Internacian Lingvon. Huynh-ba-Duong verkis la unuan vjetnamlingvan lernolibron de Esperanto (Hanoi 1932); grupoj fondiĝis en la provincoj Tonkino kaj Koĉinĉinio. Tamen, la tiamaj regantoj rigardis la freŝnaskitan Movadon per suspektemaj okuloj, farante ĉion por malhelpi ĝian disvastiĝon. Post la Aŭgusta Revolucio de 1945, kiam fondiĝis Vjetnama Demokratia Respubliko, la esperantistoj reorganiziĝis, radiostacio uzis Esperanton, sed la aktiveco ĉesis pro la militrezistado kontraŭ la Francoj.

Nur ekde 1954 revigliĝis la Movado en Norda Vjetnamo. La 9-an de decembro 1956 estis fondita Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA), vera amasorganizaĵo, kiu havas prestiĝon kaj influon en la lando kaj al kiu aliĝis famkonataj personoj (i.a. la Kulturministro Hoang-minh-Giam), multnombraj intelektuloj kaj

gejunuloj; krom pli ol 2.500 aktivaj membroj, estas 5.000 apogantoj. En sia unua dekjara periodo VPEA distribuis al kursfinintoj 2.500 unuagradajn kaj pli ol 700 duagradajn atestilojn.

Fremdlingva Eldonejo en Hanoi, granda ŝtata libro-entrepreno, havas Esperanto-fakon kaj eldonis ĝis nun, kunlabore kun VPEA, kvindekon da verkoj literaturaj, sociaj kaj kulturaj. En la jaroj 1959—1963 aperis la revuo *Vjetnamio Antaŭenmarŝas*, kiun nun, pro la militkondiĉoj, anstataŭas la bulteno *Informado*. VPEA ĉiujare eldonas ankaŭ vjetnaman numeron de *Paco*.

Prezidanto de VPEA estas (de 1968) ĝia kunfondinto Nguyen-van-Kinh, multjara ambasadoro en Moskvo; ĝenerala sekretario (de 1956) estas Dao-anh-Kha, kiu i.a. redaktis kvin lernolibrojn kaj vortaron kaj tradukis vjetnamen verkojn de Shakespeare, konsultante Esperantajn tradukojn.

15.4 ESPERANTO EN ALIAJ LANDOJ

La organo de UEA estas legata en 88 landoj. Oni do komprenas, ke la Internacia Lingvo ne estas konata nur en tiuj landoj, kiuj havas landan asocion — kvankam en dudeko da landoj UEA havas nur po 1-2 membroj. Restas fakto, ke en multaj terpartoj Movado entute ne ekzistas, ĉar mankas la esencaj antaŭkondiĉoj: se malsato kaj analfabeteco bremsas socian progreson aŭ se la civitanoj ne rajtas ĝui la plenan liberecon de individuo, ne povas formiĝi aŭ bezono aŭ ebleco pri internacia komunikado kaj pri utiligo de Esperanto.

Tio aparte validas por *Afriko*, kie manpleno da esperantistoj estas dissemita tra grandega kontinento. UEA kaj TEJO havas sekciojn nur en Madagaskaro (kaj UEA krom en Zairo de antaŭnelonge ankaŭ en Sudafriko), dum la iam aktiva Landa Asocio en *Maroko* mortis pro la elmigro de la ĉefaj gvidantoj. Pri *Mozambika* Esperanto-Asocio oni aŭdis ankoraŭ en 1964 (lige kun ekspozicioj, i.a. patronataj de ekleziaj aŭtoritatoj), sed ŝajne la portugala cenzuro sufokis ĝian vivon. Apartan atenton al agado en Afriko lastatempe donas TEJO, kiu starigis en 1968 Afrikan Komisionon kun membroj i.a. en *Alĝerio, Angolo, Sudano, Togo* kaj *Tunizio;* unu komitatano de TEJO, reveninte de studo en Eŭropo, komencis en marto 1968 instrui Esperanton en junulara kulturdomo de Bamako, la ĉefurbo de *Malio*.

En la *arabaj* landoj nur ĵus vekiĝis intereso pri Esperanto, i.a. lige kun la impona eldono de *La Nobla Korano*, pri kiu raportis pluraj arabaj kaj islamaj gazetoj. En *Egiptio* pli frue estis ĝermo de Movado: Egipta Esperanto-Asocio, fondita en 1922, trovis mem-

brojn unuavice inter Eŭropanoj; en 1933—35 L. N. Newell faris kursojn laŭ Cseh-metodo; refondita en 1944, la Asocio agadis i.a. inter soldatoj kaj militkaptitoj, sed ekde 1951 la Movado haltis. De kelkaj jaroj malfermiĝis novaj perspektivoj post la apero de Esperanto-araba poŝvortaro (1968) kaj Esperanto-araba lernolibro (1969), ambaŭ verkitaj de Nassif Isaac, kiu longtempe estis la sola araba delegito dum Universalaj Kongresoj. (La unua lernolibro de Esperanto por Araboj aperis en 1908 en Romo, kaj en 1930 aperis sub aŭspicioj de UEA araba ŝlosilo.) En 1966 komenciĝis korespondaj kursoj de Esperanto en *Irako;* ilin partoprenas ankaŭ Araboj en aliaj landoj, i.a. en *Sirio.* La Iraka Ministerio pri Kulturo petis en 1970 raporton pri la utiligo de Esperanto en turismo, planante la eldonon de broŝuro.

En *Turkio* kredeble neniam estis pli ol kelkdeko da esperantistoj dum iu momento en la historio de la lingvo, kaj preskaŭ ĉiu el la ekzistantaj lernis ĝin ekster la lando. Inter 1907 kaj 1951 eldoniĝis sep lernolibroj aŭ vortaroj de Esperanto por Turkoj; sekvis du pliaj lernolibroj en 1965 kaj en 1966 (verkita de usona packorpusano). En la 50'aj jaroj, laŭdire kelkaj esperantistoj estis arestitaj pro ricevo de eksterlandaj (komunistaj?) Esperanto-eldonaĵoj.

Progresoj en aliaj landoj de *Azio* estas malrapidaj, sed rimarkeblaj. En *Nepalo,* sekve de la instruado de Tibor Sekelj, fondiĝis en 1957 societo, kun apogo de la Edukministro, kaj en 1961 UEA sendis alian Jugoslavon, Simo Milojević, por instrui Esperanton en tiu lando (dum ok monatoj pli ol 200 studentoj partoprenis sep kursojn). En *Cejlono,* kie jam en la 30'aj jaroj kelkaj kleraj budhanoj lernis kaj disvastigis Esperanton, instruis en 1962 alia sendito de UEA, Victor Sadler. Rezulte, estis fondita — ne longviva — Cejlona Esperanto-Societo kaj aperis Esperanta-sinhala vortareto, eldonita de UEA kaj presita en la Universitato de Cejlono. Kurson de la lingvo komencis aperigi en 1967 unu enlanda ĵurnalo.

En *Tajvano,* en 1960, estis eldonita, kun la subteno de iu Ĉina Junulara Kontraŭkomunista Nacisava Asocio, 178-paĝa lernolibro kun vortaro, *La Skizo de Esperanto,* kiun kompilis William Han. Pri Esperanto prelegas kaj verkas J. B. Se-ĉien Kao, profesoro de Katolika Universitato Fu-Jen. Novaj lernolibro kaj vortaro por Ĉinoj aperis en 1970. Informado pri la Internacia Lingvo okazis lastatempe ankaŭ en *Hongkongo,* kie loĝas unu el la membroj de la Azia Komisiono de TEJO.

En *Tajlando,* antaŭ kaj post la lasta milito, kelkfoje komunistoj uzis Esperanton; en 1938 aperis Esperanto-siama legolibreto. En *Suda Vjetnamo* reviviĝis en 1969, kun helpo de la aŭstralia ambas-

adoro Ralph Harry, la iama Esperanto-Grupo de Sajgono, kiu tuj komencis organizi kursojn. En 1971 aperis *Esperanta-vjetnama vortareto* de Nguyen-phuoc-Khang, kaj fine de la sama jaro estis starigita „Agadgrupo por Esperanto", el kiu evoluu landa asocio.

La unua esperantlingva libro en *Filipinoj* aperis jam en 1911 *(Eĥoj el Manila)*, kaj tuj antaŭ la Dua Mondmilito ĉinaj enmigrintoj klopodis fondi Filipinan Esperanto-Asocion. Ekde 1968 unu radiostacio en Manila elsendas en Esperanto dufoje 15 minutojn dum semajno, kaj en 1969 200 studentoj eklernis Esperanton en la kolegio Zaragoza, en Tayng.

Sur la teritorio de nuna *Indonezio* laboris por Esperanto jam antaŭ 50 jaroj Tjong Hie Liem, kiu ekeldonis en 1925 la revuon *Hinda Esperantisto* kaj fondis en 1929 Unuiĝon de Geesperantistoj en Nederlanda Hindujo, sed la nederlandaj aŭtoritatoj ne favoris disvastigon de Esperanto fare de Indonezianoj mem. Tamen aperis ankoraŭ ŝlosilo kaj lernolibro (en 1931 resp. 1932). S-ino Datu Tumenggung, influa persono en la publika vivo de sia lando, restarigis la Movadon, fondante en 1952 Indonezian Esperanto-Asocion kaj gvidante kursojn; plurfoje ŝi estis atentata gasto ĉe Universalaj Kongresoj. Sed ŝian morton en 1963 sekvis nova periodo de stagnado.

En pluraj landoj de *Latina Ameriko* Esperanto estas apenaŭ konata. Antaŭ la Unua Mondmilito la Movado dum mallonga tempo floris, sed same rapide velkis. Tamen plej rimarkinde ŝanĝiĝis la situacio en *Kubo*: la ĉefa gazeto *Granma* aperigis en septembro 1970 ampleksan artikolon pri Esperanto, kaj la Ministerio pri Edukado komencis esplori proponon instruigi la Internacian Lingvon „en ĉiuj lernejoj kaj universitatoj" de la lando. Oni jam komencis pretigi kadron de instruistoj kaj kunlabori kun lokaj Esperanto-kluboj por plirapidigi la diskoniĝon de la lingvo; provinca direkcio por lingvo-instruado fondis Esperanto-Komisionon, kiu kolektas informojn pri la monda lingvo-problemo por ebligi al la ministerio fari definitivan decidon. En 1967 estis fondita Esperanto-rondo en la Universitato de *Portoriko*. UEA havas peranton en *Peruo* ekde 1969, kiam komenciĝis du kursoj en la ĉefurbo Lima. En la sama jaro estis ankaŭ kurso en la Universitato de Santiago, *Ĉilio*. Estas notinde, ke en 1969—70 la Centra Oficejo de UEA ricevis el Latina Ameriko pli da informpetoj pri Esperanto ol el kiu ajn alia mondoparto.

En *Eŭropo*, landaj Esperanto-asocioj (aŭ kompareblaj tutlandaj institucioj) troviĝas en ĉiuj suverenaj ŝtatoj, escepte de Albanio, Turkio kaj la „liliputaj" ŝtatoj.

En kelkaj manlibroj oni asertas, ke antaŭ la Dua Mondmilito

Esperanto estis devige instruata en la lernejoj de *Albanio*. Efektive, la albana registaro oficiale skribis al Edmond Privat, ke ĝi decidis — per dekreto n-ro 475 de la 3-a de junio 1922 — la devigan enkondukon de la lingvo en ĉiujn duagradajn superajn kaj komercajn lernejojn, sed pri realigo de tiu plano oni poste nenion aŭdis. La solaj esperantlingvaj eldonaĵoj estas du biografioj de la nacia heroo Skanderbeg, aperintaj en 1929 kaj 1969. Krome aperis nur albana ŝlosilo en Italio antaŭ la milito. La unua kurso postmilita okazis en 1959. Laŭ ĉina fonto, poste plialtiĝis la nombro de esperantistoj, aperis eĉ filmo kaj pri Esperanto ofte raportis gazetoj.

15.5 BIBLIOGRAFIO

Mudrak, W., k.a., „La Esperanto-Movado en Aŭstrujo". *Kongresa Libro*, 55-a UK. Vieno 1970, p. 26-29.

„Historio de la laborista Esperanto-Movado en Aŭstrio". *La Socialisto*, vol. 5, 1968, n-ro 2, ĝis vol. 7, 1970, n-ro 3/4.

Texeira de Freitas, M. A., *O Esperanto no Brasil*. Rio de Janeiro 1945.

Williams, Norman, „Esperanto en Britujo". *Kongresa Libro*, 56-a UK. Londono 1971, p. 13-15.

Forster, Peter G., *Survey of social composition and attitudes of membership of the British Esperanto Association*. University of Hull, Dept. of Sociology and Social Anthropology, Occasional Bulletin, N-roj 1-8, 1969/70.

Murgin, Canko, *Historio de bulgara Esperanto-Movado. Kajero unua (1885-1890)*. Kokemäki 1964.

Sarafov, Ivan, *Skizo de la historio de bulgara Esperanto-Movado*. Sofia 1971.

Rapport vedrørende anvendelsen af Esperanto i Danmark. København 1953.

Klemola, Irja, „La Esperanto-Movado en Finnlando". *Kongresa Libro*, 54-a UK. Helsinki 1969, p. 21-23.

Deligny, M. E., *Histoire de la Fédération Espérantiste du Nord de la France*. Saint-Omer 1935.

Behrendt, A., *Deutscher Esperanto-Bund e.V. Ein Rückblick auf 25 Jahre*. Berlin 1931.

„Esperanto en Hispanujo". *Kongresa Libro*, 53-a UK. Madrid 1968, p. 48-50.

„Le tappe dell'Esperanto in Italia". *L'Esperanto*, vol. 46, 1968, n-ro 132, p. 14-19.

Miyamoto masao, *Historio de la japana Esperanto-Movado*. Kioto 1969.

Ĝivoje, Marinko, *Historio de Esperanto-Movado en Jugoslavio.* Zagreb 1965.

Kökény, Ludoviko, „La Movado en Hungario". *Gvidlibro de Supera Ekzameno,* vol. II. Budapest 1966, p. 62-82.

„La Esperanto-Movado en Nederlando". *Kongresa Libro,* 49-a UK. Hago 1964, p. 42-43.

Jubileumboek 1911-1936. Amsterdam 1936.

„La Esperanto-Movado en la nordaj landoj". C. Støp-Bowitz, J. R. G. Isbrucker, *La Esperanto-Movado.* Oslo 1948, p. 42-58.

„Esperanto en Usono". *Kongresa Libro,* 57-a UK. Portland 1972, p. 20-22.

Tikos kaj Giani, „Esperanto en Ĉinio". *El Popola Ĉinio,* vol. 1, 1950, n-ro 2, p. 6.

Blanke, Detlev, „Pri la Germana Laborista Esperanto-Asocio (LEA)". *Der Esperantist,* vol. 4, 1968, n-ro 26/27, p. 12-14.

Andrianova, Nadia, „El la historio de Esperanto-Movado en Ukrainio". *Tra Soveta Ukrainio,* 1969, n-ro 6, p. 25-31.

Dao Anh Kha, „La Esperanto-Movado en Vjetnamujo". *Oomoto,* jaro 47, 1972, p. 5-9, 51-56.

ĈAPITRO 16

ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ POR FAKAJ KAJ SPECIALAJ CELOJ

16.1 ENKONDUKAJ RIMARKOJ

Konforme al la principo de universaleco de UEA, la Statuto de Universala Esperanto-Asocio ebligas al diversaj internaciaj fakaj kaj specialaj organizaĵoj, uzantaj Esperanton por progresigi siajn apartajn celojn, partopreni en la agadoj de la Asocio. Tiu kunlaboro havas grandan valoron, ĉar ĝi ne nur kontribuas al la fortikigo de la Esperanto-Movado ĝenerale, sed ankaŭ akcelas la disvastigon de fakaj konoj. La reciproka helpo inter UEA kaj tiuj organizaĵoj donis tre bonajn rezultojn en la lastaj jaroj.

La neŭtralaj Fakaj Asocioj (FA) povas aliĝi al UEA kaj en tiu kazo ili estas reprezentitaj en la Komitato de la Asocio. Se tia organizaĵo ne deziras aliĝi, ĝi povas fari kontrakton kun UEA pri komuna agado, interŝanĝo de servoj kaj reciproka helpo. Fine, diversaj neneŭtralaj internaciaj Esperanto-asocioj, kiuj havas specialajn celojn, povas, same tiel, fari kontrakton pri kunlaboro kun UEA, se ĝi ne kontraŭas la principon de neŭtraleco kiel difinita en art. 4 de la Statuto. Sekve, ĉiuj fakaj kaj specialaj organizaĵoj estas grupigitaj jene: FA neŭtralaj aliĝintaj al UEA; FA en kontraktaj rilatoj kun UEA (neŭtralaj kaj neneŭtralaj); FA kaj aliaj specialaj organizaĵoj troviĝantaj ekster la kadro de UEA, sed tamen kelkfoje neformale kunlaborantaj en diversaj agadoj kaj mondaj kampanjoj de la Asocio. En la sekvantaj sekcioj estos prezentitaj plej koncize nur la bazaj faktoj pri tiuj organizaĵoj.

16.2 FAKAJ ASOCIOJ ALIĜINTAJ AL UEA

16.2.1 Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)

Unu el la plej malnovaj specialigitaj Esperanto-unuiĝoj estas tiu de la fervojistoj. Same kiel la fervojistoj en siaj profesiaj rilatoj jam frue en la pasinta jarcento ekkunlaboris trans la landlimojn, tiel ankaŭ la esperantlingvaj fervojistoj jam en 1909 (dum la Universala Kongreso en Barcelona) fondis propran internacian societon sub la nomo „Internacia Asocio de Esperantistaj Fervojistoj" (IAEF). Ĝi ne atingis konsiderindan membronombron, sed evoluis esperplene, ĝis subite la eksplodo de la Unua Mondmilito praktike ĝin likvidis.

Post refondo de IAEF en 1921, formiĝis aliĝintaj asocioj en deko da landoj. Estis eldonata internacia gazeto kaj iĝis fruktodona la kunlaboro kun la internacia sindikataro. Estas konataj konsiderindaj agoj el tiuj jaroj fare de pluraj sindonaj kolegoj en diversaj landoj, precipe en Ĉeĥoslovakio kaj Germanio en formo de tradukitaj ampleksaj dekretoj internfervojaj kun internacia karaktero kaj de la unua fervoja terminareto kun 1.300 vortoj. Tamen ne abundis taŭgaj gvidantoj, mankis monrimedoj, kaj post la malapero de kelkaj landaj asocioj, kiuj laboris en la influsfero de la faŝismaj reĝimoj, fine la Dua Mondmilito denove komplete ruinigis la fruktojn de multjara strebado.

Dum la 21-a SAT-Kongreso en Amsterdam, en aŭgusto 1948, ĉefe nederlandaj kaj francaj kolegoj refondis sian Federacion, sub la nomo „Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj". De tiam por la Federacio, kiu nun nomiĝas Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), komenciĝis tempo relative prospera, kompare kun la antaŭaj periodoj. La membronombro kreskis de 250 kaj tri landaj asocioj en 1948 al 3.050 membroj kaj 19 landaj asocioj en 1971. Ekde 1949 IFEF ĉiujare organizas kongresojn, kiuj okazis laŭvice en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj. Apud allogaj turismaj programeroj ili akcentas la fakan karakteron de la federacio. Pro tio la kongresoj regule prezentas altvalorajn fakprelegojn pri aktualaj problemoj de la gastlando, fakekskursojn al fervojaj vidindaĵoj, kontaktojn kun eminentaj fervojistoj kaj kun aliaj branĉoj de la kultura laboro inter fervojistoj. Krome oni ne forgesas la gravajn rilatojn kun la fervojistaj sindikatoj en nacia kaj internacia skaloj.

Nefervojisto ne povas imagi, kiel komplika, ampleksa kaj multflanka estas la „fervojista lingvo", parte eĉ nekomprenebla por fervojistoj mem en ilia nacia lingvo. Des pli malfacile estas krei

terminaron taŭgan por internaciaj celoj. Surbaze de la seslingva internacia oficiala terminaro de Internacia Unuiĝo de Fervojaj Administracioj, terminara komisiono de IFEF okupiĝas pri tiu laboro, kiu celas esperantigi 11.000 vortojn. La germana landa asocio eldonis en 1966 terminareton kun 2.000 radikoj, surbaze de kiu aliaj landaj asocioj de IFEF prilaboras proprajn terminaretojn. En 1971 aperis fervojista terminaro de Esperanto kaj serbokroata; pli frue pretiĝis hungara kaj norvega terminaroj. Tradukitaj estis la internaciaj konvencioj pri la pasaĝer- kaj pakaĵ-trafiko kaj pri la frajttrafiko. En 1953 IFEF subskribis kontraktojn pri kunlaboro kun UEA kaj SAT. En 1966 ĝi aliĝis al UEA kiel faka asocio.

Laŭ iniciato de landaj IFEF-sekcioj kelkaj fervojaj kompanioj enmetis esperantlingvajn tekstojn en la porpasaĝerajn klarigojn de siaj horaroj, aliaj eldonis varbilojn kaj prospektojn en Esperanto. Ĉiujare aperas multaj artikoloj pri aferoj de IFEF en la fervoja fakrevuaro resp. en distraj kaj kulturaj gazetoj por fervojistoj. Apud la multnombraj personaj kontaktoj, kiujn IFEF daŭre peras, ĝi celas konvinki fervojajn instancojn, ke helpe de la Internacia Lingvo eblus konsiderinde raciigi la internacian trafikon.

De 1948 ĝis 1966 la estraro de IFEF estis komplete nederlanda, poste ĝi iom internaciiĝis, kaj ekde 1968 ĝi estas plene internacia.

16.2.2 Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ)

Jam en 1906, dum la Dua UK en Ĝenevo, estis fondita Internacia Societo de Esperantistoj Juristoj (ISEJ). La iniciatinto estis advokato A. Michaux, la fama organizinto de la Bulonja Kongreso, kiu fariĝis prezidanto de la nova Societo, dum D-ro P. Degon, advokato en Neuilly-sur-Seine, fariĝis ĝia sekretario. La organo de ISEJ estis *La Revuo*. Post la Unua Mondmilito la societon gvidis D-ro J. Litauer, advokato en Varsovio, kaj D-ro S. Liebeck, advokato-notario en Berlino; advokato Chapron el Le Mans estis ĝia ĝen. sekretario. La kunvenoj de ISEJ okazadis dum la UK. En 1932 aperis *Germana-Esperanta Jurista Vortaro*. Pro la malbonaj politikaj cirkonstancoj en Germanio, ISEJ ĉesis funkcii jam antaŭ la Dua Mondmilito.

La nuna Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) estis fondita en 1957 dum la 42-a UK en Marseille, laŭ iniciato de Prof. D-ro I. Lapenna, kiu fariĝis ĝia prezidanto. La aliaj membroj de la unua Plenuma Komitato estis: D-ro W. Herrmann, juĝisto (Germanio) kaj R. Sakowicz, advokato (Pollando), vicprezidantoj; Jean Duthilleul, advokato (Francio), sekretario-kasisto. Fine de 1957 IEAJ havis 70 membrojn en 27 landoj. Ĝi tuj faris kontrakton pri

16.2 FAKAJ ASOCIOJ ALIĜINTAJ AL UEA

kunlaboro kun UEA, sed en 1961 ĝi aliĝis al UEA. Nun (1972) IEAJ havas 208 membrojn en 31 landoj. Ĝia Plenuma Komitato plurfoje ŝanĝiĝis. Nun ĝin formas Prof. D-ro I. Lapenna **(Britio),** prez.; D-ro Lajos Márton, prokuroro (Hungario) kaj Erik Gadd, juĝisto (Finnlando), viceprezidantoj; D-ro Ludwig Röll, notario (Germanio), sekretario-kasisto.

La celo de la Asocio estas disvastigi la Internacian Lingvon inter la juristoj kaj antaŭenigi ĝian praktikan uzon en la internaciaj rilatoj de juristoj; plue, helpi la utiligon de la lingvo por fakaj, profesiaj kaj jursciencaj celoj de siaj membroj.

Jam la fondkunveno de 1957 difinis la bazan agadlinion por realigo de la celoj: instigi la membrojn aliĝi al UEA kiel MA kaj fariĝi fakdelegitoj pri juro; rekomendi al la membroj aliĝi al granda internacia faka jurista organizaĵo kaj diskonigi la lingvon en juristaj medioj; organizi dum la UK publikajn kunvenojn pri aktualaj juristaj problemoj en kunlaboro kun juristaj neesperantistaj organizaĵoj; evoluigi la juran terminaron en la Internacia Lingvo. La Asocio agis kaj plu vastigas sian laboron laŭ tiuj ideoj.

Ekde la UK en Mainz (1958) regule okazis publikaj kunvenoj, organizitaj de IEAJ en kunlaboro kun loka neesperantista jurista organizaĵo. Ofte la kunvenoj okazis ekster la kongresejo, ekzemple en la ejo de la koncerna loka jurista asocio. La ĉeftemo estas aŭ iu aktuala jura problemo, kiu havas ĝeneralan intereson, ekzemple la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj (1958), aŭ grava demando sur la kampo de kompara juro. Al tiu lasta kategorio apartenas, ekzemple, la pozicio de advokato, la respondeco de aŭtoposedanto, la koncepto de proprieto kaj ĝiaj ĉefaj limigoj, la egaleco de seksoj en familia juro, ŝtataneco, rajto de kunvenado kaj organiziĝo, k.a., ĉiam laŭ la juro de diversaj landoj. Kutime deko aŭ pli da raportoj, verkitaj de membroj kompetentaj en la koncerna jura branĉo, donas realecan bildon pri la jura situacio en diversaj landoj kaj ebligas komparojn. Tio havas ne nur teorian, sed ankaŭ praktikan valoron. Pro la ĉeesto de juristoj, kiuj ne regas Esperanton, aldone al la Internacia Lingvo estas uzata ankaŭ la nacia de la koncerna lando. La materialoj — raportoj kaj intervenoj — aperas poste en la *Internacia Jura Revuo,* organo de la Asocio.

La unua numero de *Internacia Jura Revuo*, redaktata de D-ro Lajos Márton, aperis en 1966. Komence ĝi estis stencilita, nun ĝi aperas presite. La 10 grandformataj kajeroj, publikigitaj ĝis 1972, enhavas valorajn artikolojn kaj studojn pri diversaj juraj demandoj, novaj leĝoj aŭ kodoj, aldone al la menciitaj materialoj de la publikaj kunvenoj. Kiel aparta broŝuro aperis la kolektiva verko

La Pozicio de Advokato laŭ la Juro de Diversaj Landoj. En 1970 estis publikigitaj *Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj* kaj *Statuto de la Internacia Kortumo,* tradukitaj de R. Harry, I. Lapenna kaj E. Svane. Estas preparata la publikigo de la Konvencio pri Diplomatiaj Rilatoj kaj Konvencio pri la Juro de Traktatoj, ambaŭ tradukitaj de R. Harry. Membroj de la Plenuma Komitato donis helpon en la difinado de juraj terminoj en *Plena Ilustrita Vortaro.*

Viglaj estas la profesiaj interŝanĝoj de informoj inter la membroj. Sufiĉe ofte la membroj, precipe la fakdelegitoj de UEA pri juro, faras diversajn praktikajn servojn al kolegoj kaj, pere de ili, ankaŭ al nemembroj.

16.2.3 Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)

ISAE estis fondita la 30-an de aŭgusto 1906 en Ĝenevo, dum la 2-a Universala Kongreso, kun la celo enkondukadi la uzon de Esperanto en sciencon (poste aldoniĝis ankaŭ la celo disvastigadi sciencajn konojn inter esperantistoj). La grundo estis preparata dum du jaroj, per eldonado de *Internacia Scienca Revuo,* de kiu — ĝis la Unua Mondmilito — aperis ok grandformataj volumoj, kun entute preskaŭ 4.000 paĝoj. En la revuo aperis ankaŭ multaj gravaj kontribuaĵoj pri originalaj sciencaj esploroj.

Unu el la kunfondintoj kaj la unua prezidanto de ISAE estis Generalo Sebert. Aliaj naŭ prezidantoj kaj vicprezidantoj el tiu vivperiodo de ISAE estis same konataj sciencistoj, inter kiuj nobelpremiito J. J. Thomson, profesoro en la Universitato de Kembriĝo (Cambridge).

Post la Unua Mondmilito, la restarigo de la Asocio okazis en la jaro 1922, ĉefe dank' al Maurice Rollet de l'Isle, kiu estis la ĝenerala sekretario en la lastaj antaŭmilitaj jaroj kaj la prezidanto de la provizora estraro ĝis la jaro 1925. Kiel la organo de la Asocio estis regule aperigata, ekde 1926, *Bulteno de la Internacia Scienca Asocio Esperantista,* kiun redaktadis same Rollet de l'Isle (li restis la ĝenerala sekretario de ISAE ĝis la jaro 1933, portante tiel la plej pezan laboron en ISAE). Kontraŭe al la antaŭmilita periodo, kiam oni ĉiujare elektadis novan prezidanton, dum la tuta tempo inter la du mondmilitoj restis la prezidanto D-ro Odo Bujwid, profesoro en la Universitato de Krakovo.

La restarigo de ISAE post la Dua Mondmilito komenciĝis jam en 1947, kun la ĉefa laborportanto, prezidanto de la provizora estraro, muzea kuratoro C. Støp-Bowitz (Universitato de Oslo). La postmilitaj prezidantoj estis: Prof. M. Fréchet (Universitato de Parizo, 1950—53), Prof. S. Nishi (rektoro de Gunma-Universitato,

Japanio, 1953—59), Prof. W. E. Collinson (Liverpool, Anglio, 1959—65), Prof. Y. Väisälä (Turku, Finnlando, 1965 ĝis sia morto en 1971).

Sub la redaktado de D-ro W. P. Roelofs kaj D-do G. F. **Makkink**, en 1949 ekaperis *Scienca Revuo*, eldonata komence de privata eldonisto Muusses el Nederlando. En 1961 la revuon transprenis, entre neenviinda stato, ISAE mem. La ŝarĝon de la redaktado kaj de la eldonado transprenis Prof. B. Popović, kiu en 1954 fariĝis la ĝenerala sekretario. Redaktata kaj presata en Jugoslavio, la revuo maturiĝis sufiĉe por transiri, ekde la jarvolumo 21, al ses numeroj jare minimume po 32 paĝoj, en pligrandigita formato.

Intertempe kreiĝis en la kadro de ISAE studenta sekcio (STELO) kaj pluraj fakaj sekcioj (arkitekt-konstruista, medicina, filologia, geologia, astronomia, teknikista). Tial la skribaĵoj pri organizaj kaj priesperantaj problemoj ne plu aperadas en *Scienca Revuo*, sed en aparta *Bulteno* de ISAE kaj de ĝiaj sekcioj, publikigata laŭbezone (3-6 fojojn jare).

Okaze de sia 50-jara jubileo, ISAE eldonis la kolekton *Sciencaj Studoj* (1958), en kiu trovis lokon multaj artikoloj pri originalaj esploroj el ĉiuj sciencaj kampoj, redaktita de D-ro P. Neergaard, mondokonata fakulo pri plantmalsanoj (tie oni povas trovi ankaŭ pli detalajn sciigojn pri la historio de ISAE kaj de utiligado de Esperanto por sciencaj celoj).

La nuna kaj proksimestonta laboro de ISAE havas precipe eldonan karakteron. Post plifirmigo de la revuo, oni baldaŭ transiros al ekeldonado de lernolibroj, manlibroj, monografioj k.s. en Esperanto, kiom la financaj rimedoj permesos. Paralele kun tio oni provados utiligi pli vaste la amplekse faritan laboron en la Terminologia Centro de ISAE kaj eldonadi diversfakajn terminarojn.

16.3 ORGANIZAĴOJ KUNLABORANTAJ KUN UEA

16.3.1 Neŭtralaj Fakaj Asocioj

16.3.1.1 *Internacia Societo de Arkitektoj- kaj Konstruistoj-Esperantistoj (ISAKE).* — Fondita en 1959, ISAKE estas memstara sekcio de ISAE, ariganta personojn, kiuj laboras, konstruas aŭ projektas en arkitekturo kaj konstruado. Ĉefa celo de ĝia agado estas: apliko de Esperanto en arkitekturo kaj konstrufakoj, kompilado de arkitekturaj kaj konstrufakaj terminaroj, interŝanĝo de fakaj manlibroj, revuoj kaj spertoj. Ĝiaj 138 membroj estas ligitaj per „Oficiala Informilo". La centro de ISAKE troviĝas en Zagreb, Jugoslavio.

16.3.1.2 *Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (IEKA).* — Ekzistas en la mondo miloj da aŭtomobilistoj, kiuj, per Esperanto, solvas siajn problemojn dum vojaĝoj eksterlanden.

Ilin klopodas kunigi en forta organizo Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista, fondita en la jaro 1964 kun la celo disvastigi tiun praktikan uzadon de la Internacia Lingvo kaj enpenetri, per taŭga informado, en la neesperantistajn fakajn mediojn.

Al la delegitoj de UEA pri „aŭtomobiloj" aldoniĝis, laŭ instigo de IEKA, la fako „SOS-aŭto-servo" por doni al la aŭtomobilistoj sciantaj la Internacian Lingvon efektivan helpon en la malfacilaj cirkonstancoj de paneoj kaj strataj akcidentoj en fremdaj regionoj.

Nuntempe tiu delegita reto ampleksas 14 landojn, kaj ĝi disvastiĝos paralele kun la kresko de la membraro kaj danke al varba laboro de pluraj Landaj Reprezentantoj.

En la terminara kampo, kies evoluo estas esenca por la celoj de IEKA, oni iniciatis la kompiladon de seslingva „Aŭto-Terminaro", kiu jam aperis kiel „propono" en multobligita formo. Ĝi estos kiel eble plej baldaŭ ĝisdatigita por definitiva eldono.

Estas ankaŭ antaŭviditaj aliaj eldonaĵoj, kiel ekzemple detalaj informoj en Esperanto pri diversaj landoj por la aŭtomobilistaj turistoj. Ilia realigo, kiu dependos de la ebleco disponi pri taŭgaj kunlaborantoj, estos tre utila por evidentigi en plej diversaj medioj (aŭto-firmoj, benzin-kompanioj, turismaj instancoj, ktp.), la valoron de la Internacia Lingvo kaj la ekziston de ne indiferenta „merkato" en la Esperanto-Movado.

16.3.1.3 *Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj (IABO).* — Fondita en 1967, tiu ĉi Asocio celas (1) helpi profesiulojn per internacia kunlaboro sur la biblia kaj orientalisma kampo, (2) disvastigi en la mondo la biblian kaj orientan kulturon, eldonante ekumenan Biblion kun kritikaj notoj kaj aliajn taŭgajn verkojn, (3) organizi internaciajn kongresojn, specialajn kunvenojn, fakajn seminariojn kaj instruekskursojn tra orientaj landoj, (4) publikigi internacian adresaron de bibliistoj kaj orientalistoj.

Organo de IABO nun estas *Biblia Revuo,* kiu aperis de 1964 ĝis 1966 en Aŭstralio kaj ekde 1968 en Italio, daŭre sub la redakto de la aŭstralia orientalisto Donald Broadribb. Per siaj altnivelaj artikoloj, kiujn nun akompanas la unuaj provoj de la nova traduko de la Biblio, tiu dumonata revuo jam akiris konsiderindan prestiĝon en fakaj rondoj.

16.3.1.4 *Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE).* — Blindaj esperantistoj ne estas, nek volas esti, aparta kategorio de praktikantoj de Internacia Lingvo; pro sia blindeco ili nur devas havigi

al si lernilojn, komunikilojn kaj literaturajn trezorojn per metodoj senvidaj. Tio ja koncernas ne nur Esperanton, sed la vivon ĝenerale, kaj en ĉiuj civilizitaj landoj la ŝtato kaj aliaj publikaj instancoj zorgas, ke ankaŭ blindaj civitanoj havu laŭeble plenan aliron al ĉiuj kulturaj atingaĵoj de la homaro. Ĉar la ŝtato apenaŭ ie zorgas pri Esperanto kaj ĉar la Esperanto-Movado apenaŭ havas la necesajn rimedojn por zorgi pri siaj blindaj anoj, ili laŭeble devas tion fari aŭ farigi por si mem.

Konsiderante la ekstreme mizeran staton de la blinduloj ĉe la sojlo al la dudeka jarcento — kompare kun la nuna —, oni ne povas ne havi plej grandan admiron je la blindaj pioniroj kaj iliaj vidantaj helpantoj, kiuj siatempe disĵetis la unuajn Zamenhofajn semojn en la vicoj de la nevidantoj. Du nomoj speciale meritas ĉi tie omaĝan aprezon, tiu de vidanta franca profesoro Théophile Cart kaj tiu de sveda blinda kaj surda brajlopresisto Harald Thilander (1877-1958). En 1904, Prof. Cart fondis kaj Thilander ekpresis la brajlan revuon *Esperanta Ligilo*, kiu ankoraŭ hodiaŭ ekzistas, havante milon da abonantoj en trideko da landoj; en 1912, ankaŭ la redaktado transiris al Thilander kaj nun jam dum jardeko tiun taskon plenumadas franca blinda instruisto Raymond Gonin. Post la morto de Harald Thilander la brajla presejo laŭgrade ĉesis funkcii kaj nun la revuo estas presata en Svislando.

La revuo meritas tiel larĝan mencion, ĉar ĝi ne nur laŭnome sed ankaŭ laŭfakte estis kaj restis *ligilo*, kruele interrompita nur de la militoj kaj submetita al la ĉiam postmilitaj malbonaj cirkonstancoj. Nun ekzistas ankaŭ landaj asocioj de blindaj esperantistoj, kaj kelkaj el ili havas sian propran revueton. Plej granda el ili estas *La Kontakto* (Nederlando); krome ni menciu *Italan Ligilon*, *Informilon* (okcidenta Germanio) kaj *Ĉe Ni* (Anglio). En Ĉeĥoslovakio aperas kiel aldono al tiea oficiala blindulrevuo: *Aŭroro*, kaj same en Pollando *Pola Stelo;* similaj kajeroj nun, ekde 1968, venadas el orienta Germanio.

Ĉiuj landaj asocioj de blindaj esperantistoj denove estis kunigitaj, en 1951, en Ligo Internacia de **Blindaj Esperantistoj (LIBE)**. Simila organizaĵo jam ekzistis inter la mondmilitoj, kaj oni en 1932 eĉ provis transformi ĝin en Universalan Asocion de Blindul-Organizaĵoj (UABO), kies rolon hodiaŭ efektive plenumadas Tutmonda Konsilantaro por Bono de la Blinduloj (TKBB) sub aŭspicioj de Unesko; Esperanto do bedaŭrinde ne sukcesis gravigi sin inter la blinduloj per praktikaj servoj, kaj kvankam ĝi estas inter blinduloj relative multe pli disvastigita ol inter vidantoj (en kelkaj landoj 50-oble), eĉ tiu proporcio ne estas tre impona.

Malgraŭ pluraj oficialaj rekomendoj (TKBB, 1959, Romo; Blind-

ulinstruista Konferenco, 1962, Hannover; Eŭropa Regiona Komitato de TKBB, 1966, Ĝenevo, kaj 1968, Londono), LIBE fakte ne gajnis terenon — sed ankaŭ ne malprogresis.

Al blindaj interesiĝantoj Esperanto povas oferti la nomitajn revuojn, milojn da libroj brajlaj el dudeko da bibliotekoj, kelkajn dekojn da libroj sur magnetofona bendo, sonbendajn periodaĵojn de kelkaj landaj asocioj (ĉefe reproduktoj el vidulpresaj revuoj), internaciajn kontaktojn per brajlo kaj sonbendo kaj integrigan aktivejon en rondoj de vidantaj kuncivitanoj-samlingvanoj. Al tio servas ankaŭ la internaciaj kongresoj de LIBE, kutime okazantaj en la kadro de la Universalaj Kongresoj.

16.3.1.5 *Esperanto-Ligo Filatelista (ELF).* — Unuavice, ELF akcelas la kolektadon de filatelaĵoj, kiuj koncernas Esperanton. Duarange ĝi subtenas siajn membrojn en ĝeneralaj filatelaj aferoj. Ĝi estis fondita en 1964 kaj havas 80 membrojn.

ELF aperigas listojn pri poŝtmarkoj, poŝtstampoj kaj aliaj poŝtoficialaj presaĵoj, kies teksto aŭ bildoj rilatas al Esperanto. Laŭ speciala sistemo, la membroj ricevas kaj interŝanĝas novajn Esperantajn filatelaĵojn.

Per konsiloj kaj materialo ELF subtenas esperantistojn, kiuj disvastigas Esperanton per filatelaj rimedoj. Medaloj kaj aliaj premioj pruvas, ke en filatelaj rondoj oni alte taksas la valoron de la filatela temo „Esperanto" dum ekspozicioj. Naŭ landoj eldonis entute 36 poŝtmarkojn kun rilato al Zamenhof aŭ Esperanto. Okaze de kongresoj k.s. estis eldonitaj kelkcent specialaj stampoj.

16.3.1.6 *Internacia Ligo de Foto-Kino-Magnetofono-Amatoroj (ILEF).* — Tiu ĉi Ligo estis fondita en 1957 kaj havas 250 membrojn. Ekzistas apartaj sekcioj pri foto, kino kaj magnetofono. La centro troviĝas en Skövde, Svedio.

16.3.1.7 *Internacia Geografia Asocio (IGA).* — IGA estis fondita en 1955 kun la celo kunigi esperantistojn, kies fako aŭ interesiĝo estas geografio, antropologio, etnologio, folkloro, arkeologio aŭ simila, kaj stimuli ilin al komuna agado. Samtempe ĝi celas enkonduki la Internacian Lingvon en tiujn fakajn mediojn, organizi geografiajn semajnojn, seminariojn kaj ekspediciojn kaj kontribui al la solvo de la problemo de geografiaj nomoj en Esperanto kaj al la preparo kaj eldonado de fakaj terminaroj kaj mapoj.

El kvin Geografiaj Semajnoj, du okazis en Jugoslavio kaj po unu en Britio, Pollando kaj Hispanio, kun meza partopreno de 50 membroj.

Laŭ propono de IGA, fondiĝis Internacia Komisiono por Ordigo

de Geografiaj Nomoj, en kiu partoprenas egala nombro de IGA-anoj kaj de Akademianoj; unua rezulto de ĝia laboro estas la *Mondmapo*, eldonita de IOE en 1968. De la organo de IGA, *Geografia Revuo*, aperis inter 1956 kaj 1964 ses kajeroj.

IGA havas ĉ. 300 membrojn. Ĝia prezidanto estas Lic. Tibor Sekelj.

16.3.1.8 *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).* —Jam en 1910 pli ol 300 instruistoj parolantaj Esperanton organizis sin en Internacia Asocio de Instruistoj, kies organo fariĝis *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR) fondita en novembro 1908 de la Ĉeĥo T. Čejka. La Revuo aperis dum multaj jaroj, sed ĉiam kun intervaloj. Post la Unua Mondmilito multaj eksiĝis el IAI kaj fondis en 1924 Tutmondan Asocion de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE), kiu tenis sin sendependa ne nur de UEA, sed ankaŭ de SAT. Fine de la 1920'aj jaroj IPR elstaris per valoraj sciencaj artikoloj pri lingvistiko kaj pedagogio. TAGE kontaktis kun diversaj internaciaj pedagogiaj institucioj, ekz. Internacia Eduka Oficejo en Ĝenevo, kaj atingis en 1931, ke la sindikato „Internacia Profesia Sekretariejo de Instruistoj" dum sia kongreso en Hamburgo publike elpaŝis por Esperanto. La plej fortaj sekcioj de TAGE estis la germana kaj sveda, sed notindaj estas ankaŭ la Esperanta resumfolio *La Vojo de Klerigo*, ekde 1926 aldonita al ukrajna pedagogia revuo, kaj la porinfana periodaĵo *Infanoj sur Tutmondo* de la franca pedagogo H. Bourguignon.

En 1949 estis fondita Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kun la celo kunligi instruistojn kaj edukistojn, kiuj scias Esperanton, tra la mondo por progresigi la instruadon de Esperanto en lernejoj, pritrakti pedagogiajn temojn, favore influi edukajn instancojn, kaj eduki instruistojn kaj lernantojn je sento de internacia solidareco kaj reciproka estimo, interfratiĝo kaj interhelpado. La ĉefaj laborantoj dum multaj jaroj estis i.a. f-inoj Violet C. Nixon kaj Jeanne Dedieu. En 1968 la gvidadon transprenis Raif H. M. Markarian, prezidanto, Helmut Sonnabend, vicprezidanto, D-ro Mario Dazzini, sekretario, k.a. Landaj sekcioj de ILEI ekzistas en Aŭstralio, Aŭstrio, Britio, Bulgario, Danlando, Finnlando, Francio, FR Germanio, Hungario, Italio, Japanio, Jugoslavio, Nederlando, Pollando, Svedio, Svislando kaj Usono.

Surbaze de ampleksaj preparlaboroj, faritaj de CED resp. de Konsulta Komisiono pri Lernejoj, koncerne la eblecojn de interŝtata konvencio pri enkonduko de Esperanto en lernejojn, la ideo komencis konkretiĝi tra la Kunordigaj Konferencoj en Maribor. Inter 1967 kaj 1972 okazis kvin tiaj konferencoj en Maribor, dum la sesa estis aranĝita en Budapeŝto en julio 1972. La ĉefa rezulto estas, ke, interkonsente kun la kompetentaj lernejaj instancoj, oni komencu

la instruadon de Esperanto laŭ unuecaj bazaj didaktikaj dokumentoj kaj unueca lernolibro en formo de Pedagogia Didaktika Eksperimento PDE ekde la lerneja jaro 1971/72. La centran gvidadon transprenis D-ro István Szerdahelyi, kies internacia lernolibro *Esperanto 1* aperis en 1972 en eldonkvanto de 10.000 ekzempleroj. En la kadro de PDE, Esperanto estas regule kaj oficiale instruata en Aŭstrio (5 lernejoj), Bulgario (2 lernejoj), Hungario (9 lernejoj), Italio (6 lernejoj), Jugoslavio (8 lernejoj); do entute en 30 lernejoj al proksimume 800 gelernantoj.

Tiu ĉi ekzemplo de la sekcioj en suda kaj sudorienta Eŭropo instigis la ILEI-sekciojn en nordokcidentaj kaj skandinaviaj landoj fondi similajn regionajn kunordigajn konferencojn.

Pli frue, okazis du gravaj Konferencoj de Lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata: la unua en Beograd (1963) kaj la dua en Graz (1965). Dum tiu lasta estis akceptita Konstanta Programo de ILEI. Por detaloj pri la problemoj ligitaj kun la klopodoj enkonduki Esperanton en lernejojn kaj pri la ĝisnunaj atingoj oni konsultu Ĉapitron 4.

ILEI kunlaboris aŭ kunlaboras kun pluraj aliaj Esperanto-organizaĵoj, precipe kun UEA (en la kadro de Konsulta Komisiono pri Lernejoj), kun TEJO, „Grajnoj en Vento" kaj „Geonkloj Esperantistaj". Komenciĝis ankaŭ preparoj por esperantlingva revuo kun facilaj tekstoj por lernejanoj.

Periodaĵoj de ILEI estis la oficiala organo *Instruista Letero* (ekde 1955), kiu titoliĝis en 1959 *Edukado Internacia* (ĝis decembro 1968). Sub aŭspicioj de ILEI aperis de 1963 ĝis 1968 dek ses numeroj de la pedagogiaj *Kajeroj* de Jugoslavia Esperanto-Instituto. Sed la plej grava nuntempa eldonaĵo de ILEI estas nun denove *Internacia Pedagogia Revuo*, kiu reaperis en 1970, la unuan fojon depost sia reviviĝo en 1956-58.

16.3.1.9 *Universala Invalida Esperanto-Asocio (UIEA).* — UIEA nur deziras helpi kaj servi, celante disvastigi konon pri Esperanto inter invalidoj kaj kripluloj, aranĝi kursojn por ili, starigi mondskalan korespond-servon, organizi invalido-vojaĝojn, disvastigi scion pri sociaj kaj aliaj problemoj komunaj al invalidoj kaj kripluloj kaj kunlabori kun ĉiaj landaj organizaĵoj por invalidoj kaj kripluloj. UIEA estis fondita en 1968 kaj havas 300 membrojn.

16.3.1.10 *Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA).* — Tiu ĉi faka asocio estis fondita la 29-an de novembro 1946, laŭ la iniciato de tri skandinaviaj ĉefredaktoroj, la Svedo Einar Adamson, la Finno Niilo Kavenius kaj la Dano R. G. Nielsen. La sidejo fariĝis Svedio, kaj tute nordlandan konsiston havis ankaŭ la unua estraro de TEĴA.

Laŭ sia statuto, celo de TEĴA estas kunigi ĉiujn ĵurnalistojn, kiuj scipovas Esperanton, por komuna kunlaboro kaj kunhelpo rilate al korespondado, interŝanĝo de artikoloj, enketoj kaj informoj pri diversaj demandoj. Per uzado de Esperanto inter ĵurnalistoj ĝi volas pruvi, ke la lingvo devas servi al praktikaj celoj. La membraro (nun pli ol 300) konsistas el du kategorioj: A-membroj, t.e. profesiaj ĵurnalistoj, kaj B-membroj, t.e. laŭokazaj kunlaborantoj de gazetaro kaj radio kaj redaktoroj de Esperantaj gazetoj.

Post la morto de sia vera motoro, Adamson, en 1953, TEĴA spertis periodon de stagnado. Reorganiziĝo okazis en 1956, kaj en 1957 la bulgara sekcio transprenis la redaktadon kaj eldonadon de la organo de TEĴA, la nun kvarfoje jare aperanta *Internacia Ĵurnalisto*. En Bulgario nun troviĝas ankaŭ la provizora sekretariejo de TEĴA, prizorgata de Ivan Keremidĉiev-Esperov; prezidanto estas la Norvego Olav Thormodsen. La plej multaj anoj de TEĴA estas en orienta Eŭropo. Membrokunvenoj okazas dum Universalaj Kongresoj.

16.3.1.11 *Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA).* — Ĉirkaŭ tiu tempo, kiam — en 1908 — fondiĝis Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA), komencis jam aperi medicinaj artikoloj en *Internacia Scienca Revuo*. En 1909 la nova faka organizaĵo aperigis sian unuan jarlibron, kaj unu jaron poste ĝi kalkulis jam 700 membrojn. La unua libro eldonita de TEKA estis *Pri Estetiko en Medicino* de H. Święcicki (1913). Sekvis tre vigla agado inter la du mondmilitoj, sed de 1939 ĝis 1959 TEKA ekzistis preskaŭ nur laŭnome.

Internacia Medicina Revuo, ekaperinta en 1923, fariĝis en 1925 la organo de TEKA. Sekve de deklaro de Japana Imperia Akademio, kiu en 1924 pledis por Esperanto kiel oficiala lingvo en medicino, multaj japanaj medicinistoj komencis verki siajn studojn en la Internacia Lingvo; la unua tezo originale verkita en Esperanto estis *La plej Simpla Metodo por Seriodiagnozo de Sifiliso* de M. Murata (1922). Samjare aperis *Latino-Esperanta-Japana Anatomia Terminaro*, sekvata de granda nombro de artikoloj en fakrevuoj, kiujn listigas bibliografio aperinta en 1956. Japana Esperantista Medicinista Asocio (JEMA) fondiĝis en 1925.

En Eŭropo aperis i.a. ampleksa *Esperanta Teknika Medicina Vortaro* de M. Briquet, eldonita de TEKA en 1932.

En 1960 TEKA reorganiziĝis kiel Universala Medicina Esperanto-Asocio, kun *Medicina Revuo*, aperanta de 1951 en Japanio, kiel organo. Al ĝi plue tamen kontribuis ĉefe Japanoj.

Artikolo de D-ro A. Albault en *La Presse Médicale* („Esperanto en medicino", 1960) estis krompresita en ĉ. 1.200 ekzempleroj kaj

vaste dissendita. La nederlanda eldonejo Elsevier enmetis en sian *Quaestionarium Medicum* (1961) ankaŭ Esperanton, apud 15 naciaj lingvoj, kaj en 1962 la firmo Philips eldonis esperantlingvan katalogon de siaj X-radiaj kaj elektromedicinaj aparatoj. Bone vendiĝis du originalaj verkoj de japanaj medicinistoj: *Lernolibro de oftalmologio* de S. Kato (1959, 1963) kaj *Nia Korpo* de S. Nishi (1961, 1965). Esperantajn resumojn aperigas nuntempe i.a. *Journal de Médecine de Lyon* kaj *Medicamundi* (de Philips, pri radiologio kaj medicina elektroniko).

UMEA, kiu kunlaboras kun ISAE ekde 1962, celas ĉefe eldonadi aktualan bibliografion de fakaj artikoloj kaj verkoj ĉiulandaj, organizadi vizitojn al medicinaj institutoj kaj ebligi partoprenon de esperantoparolantaj medicinistoj en internaciaj fakaj kongresoj. Krom Sekcio Sociale Sanitara, funkcias Medicina Terminologia Centro (sub gvido de A. Albault), kiu kontribuis medicinajn terminojn al *Plena Ilustrita Vortaro*. La membraro de UMEA estas 350 en ĉ. 40 landoj, el kiuj preskaŭ duono en Japanio.

Medicina Internacia Revuo, nova organo de UMEA (de 1964), aperas duonjare ĉe Ĉiba-Universitato, Japanio. Prezidanto estas la japano D-ro H. Ŝinoda; la sekretariejo estas en Krakovo, Pollando.

16.3.1.12 *Espermenso.* — La internacia organizaĵo Mensa estas, same kiel UEA, neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio ktp. Ĝi formiĝis en 1945 kaj rapide kreskis en multaj landoj; la usona membraro jam ampleksas pli ol 10.000. La celoj de Mensa inkluzivas sciencan esploradon en la kampoj de psikologio kaj socia scienco kaj la plifaciligon de sociaj kaj intelektaj kontaktoj inter membroj kun similaj interesoj. La kvalifiko por aliĝo estas, ke membroj devas havi inteligenton pli altan ol 98 procentoj de la homoj, alivorte en la plej altaj du centonoj.

La 19-a Internacia Ĝenerala Kunveno de Mensa en Novjorko en marto 1970 aprobis la starigon de Esperanto-sekcio sub la nomo „Espermenso".

16.3.1.13 *Muzika Esperanta Ligo (MEL).* — MEL estis fondita en 1963 dum la 34-a Itala Kongreso de Esperanto en Saint Vincent. Ĝi celas doni unuecon en internacia muzik-kampo kaj iniciati solidarecon inter muzikistoj de la tuta mondo por atingi plej altan perfektecon en la muzika arto. Membroj povas esti personoj, kiuj profesie aŭ amatore okupiĝas pri muziko. Ĝenerala sekretario estas la itala komponisto G. B. Briano, el kies plumo aperis en 1972 *Esperanto-lingva Muzika Leksikono*. Ekzistas Fakterminara Sekcio kaj Sekcio „Muzilo".

16.3.1.14 *Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE).* — P. Stojan aperigis en 1911 en Peterburgo verkon kun la nomoj de eŭropaj birdoj *(Ornitologia Vortaro Oklingva);* aliaj listoj de birdonomoj aperis en 1948 kaj 1953. En 1961 la belga zoologo Wim de Smet komencis tuteŭropan enketon pri la printempa migrado de la kukolo; la rezulto, atingita helpe de multaj esperantistoj, estis publikigita en faka revuo, kun resumoj en Esperanto. Lige kun tiu enketo, naskiĝis fine de 1961 Ornitologia Rondo Esperantlingva, kiu nun havas 200 membrojn kaj eldonas dufoje en la jaro (ekde 1964) la revuon *La Mevo.* Nova terminaro, *Komunlingva Nomaro de Eŭropaj Birdoj,* ellaborita de la nomenklatura komisiono de ORE, aperis en 1971; ĝi entenas la nomojn de 579 specioj.

16.3.1.15 *Internacia Esperanto-Ligo de Pupludistoj (IELP).* — La Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) estas unu el tiuj kulturaj festivaloj, kies oficiala lingvo estas Esperanto. Dum la 2-a kaj 3-a PIF en Zagreb (1969 kaj 1970) la spektakloj de diverslandaj trupoj okazis senescepte en Esperanto. Por pliampleksigi tiujn atingojn, en 1970 estis fondita IELP. PIF celas esti bazo por starigo de turnea servo; jam nun, sekvante la ekzemplon de PIF, aro da teatroj havas esperantlingvajn prezentadojn, kun kiuj ili planas fari turneojn. Refoje grandsukcesa estis Pupteatra Festivalo en Zagreb en oktobro 1971.

16.3.1.16 *Skolta Esperanto-Ligo (SEL).* — En sia libro *Scouting for boys* (1908), la fondinto de skoltismo, Robert Baden-Powell, instigis la skoltojn, ke ili lernu Esperanton. Dek jarojn poste britaj skoltestroj, i.a. A. W. Thomson, fondis Skoltan Esperantistan Ligon. Sian unuan internacian tendaron ĝi organizis en 1922 en Nederlando, kiun sekvis 13 pliaj ĝis 1938; en la 9-a tendaro (1930) ĉeestis i.a. la juna skolto Harold Wilson, poste ĉefministro de Britio.

Dum multaj jaroj SEL klopodis akiri la subtenon de Skolta Monda Oficejo (SMO), kiu tamen restis ĝis 1957 „vera bastiono" kontraŭ Esperanto. Kiam dum la 4-a Ĵamboreo en Gödöllö (Hungario) en 1933 estis decidite akcepti Esperanton kiel trian oficialan lingvon, SMO intervenis per malpermeso, kaj en 1934 la Komitato de SMO decidis ne stimuli la skoltojn lerni Esperanton, „ĉar sen granda valoro". Nur en 1964 tiu decido estis nuligita, „ ĉar Esperanto pruvis sian utilecon nun sur diversaj kampoj". La rilatoj inter SEL kaj SMO konsiderinde pliboniĝis post la sukceso de dulingva ĵamboreo en Britio somere 1968: 60 skoltoj el 6 landoj frekventis tie ĉiumatenajn Esperanto-klasojn, kaj ĉiuj afiŝoj kaj komunikoj en la tendaro estis en la angla kaj Esperanto. Pliaj sukcesoj estis atingitaj per nova rekta-metoda lernolibro de SEL, *Ĵamborea Lingvo,*

eldonita en 1968 kun financa helpo de UEA, kiu donas la ideon, ke Esperanto estas *la* lingvo por internaciaj skoltaj renkontiĝoj; la dua eldono aperis en 5.000 ekzempleroj kun akompana disko. Kursoj por skoltoj okazas en pluraj landoj, i.a. en Japanio, Suda Koreo kaj Zairo. SEL faris multajn laborojn por la 13-a Ĵamboreo en 1971 en Japanio. Kvankam la Ligo ne sukcesis akiri por Esperanto oficialan lokon en la organizo, la intensaj preparoj tamen donis multan utilon. SEL montris grandan aktivecon esperantigi la skoltojn, kiuj vizitis la Ĵamboreon, kies rezulto estis, ke pluraj skoltoj, kelkfoje eĉ tutaj grupoj, interesiĝis pri Esperanto kaj eklernis.

La organoj de SEL estis *Skolta Heroldo* (1926-31), *Skolta Bulteno* (ĝis 1939) kaj *Skolta Mondo*, aperanta de 1948 ĝis nun.

16.3.1.17 *Studenta Tutmonda Esperantista Ligo (STELO).* — En 1903 fondiĝis, en Gent (Belgio), la unua Esperanto-grupo de studentoj; pliaj sekvis en 1906, i.a. en Helsinki, Praha, Harvard kaj Porto Alegre. Efemeran vivon havis la unuaj studentaj gazetoj en Esperanto: la bulgara *Unua Paŝo* (1904-06) kaj la brita *La Esperanta Studento* (1906). En 1908 ekzistis en Peterburgo Internacia Societo de Esperantistaj Studentoj, kiun patronis la fama lingvisto Jan Baudouin de Courtenay (1845-1929), kaj en 1909 estis fondita en Praha Universala Studenta Unio, kiu tamen rapide elĉerpis siajn fortojn.

Post la Unua Mondmilito, sur la fono de pli vasta enpenetro de Esperanto en sciencajn rondojn, komenciĝis denove kreski ankaŭ la nombro de esperantistaj studentoj, kiuj ekde 1921 havis sian fakkunsidon en la kadro de la Universalaj Kongresoj, sed la du provoj de internacia organizaĵo, Internacia Studenta Esperanta Asocio (1924-27) kaj Universitata Esperanto-Federacio (1926-30), ne sukcesis kunligi la ofte fortajn, sed disajn studentajn klubojn. Kiam ankaŭ la fondita en 1930 Studenta Tutmonda Esperantista Ligo nur pene funkciis, ĝia iniciatinto, la prezidanto de la Studenta Klubo en Zagreb, Ivo Lapenna, submetis dum la studenta fakkunsido en Krakovo (1931) projekton, laŭ kiu oni elektu ĉiujare unu el la kluboj kiel internacian studentan esperantistan ekzekutivon. Tiu propono estis akceptita, sed la sistemo montriĝis sukcesa nur tiel longe, kiel la modela klubo de Zagreb rolis kiel ekzekutivo, t.e. ĝis aprilo 1941, kiam ĝi estis neniigita tuj post la invado de la naziaj-faŝistaj armeoj en Jugoslavion.

De 1951 ĝis 1953 danaj studentoj eldonis la revuon *La Studento*, kiel organon de Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejanoj. Rezulte de la reorganiziĝo de TEJO kaj de la aktiveco de studentaj kluboj en Cambridge, Kopenhago, Hamburgo, Parizo k.a., en aŭgusto 1958 estis fondita la nuna STELO, kiu aliĝis al ISAE kaj eldonis ekde 1959 la kvalitan periodaĵon *Studento;* inter la tiu-

tempaj agantoj troviĝis Victor Sadler, John C. Wells kaj Carlo Minnaja. En 1960 STELO eldonis, kune kun UEA, seslingvan faldfolion, en kiu kvindek universitataj profesoroj rekomendis Esperanton kiel solvon de la lingva problemo. Organizan krizon, unu el multaj, la Ligo suferis en 1962, pro la subita morto de du ĉefaj funkciuloj, Paul Ciliga kaj Kerrin Masterman. Sed en la posta jaro okazis tre sukcesa STELO-Semajno en Primoŝten, organizita de la Zagreba Klubo. Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj en Toruń (Pollando), unu el la plej agemaj, iniciatis en 1964 Internacian Studentan Sciencan Kampanjon, kiu celas pli vaste uzigi Esperanton en diplomaj disertacioj kaj en la scienco entute; la sama komencis en 1965 ciklon de altnivelaj Internaciaj Esperanto-Seminarioj en la kadro kaj kun la apogo de la Universitato de Toruń.

La ĉefaj mankoj de STELO estas: ke ĝi ĉiam restis en la ombro de TEJO, kiu mem rekrutis siajn ĉefajn aktivulojn el studentaj vicoj; ke STELO tro ofte ŝanĝis ne nur unuopajn funkciulojn, sed bloke la tutan estraron; ke, pro la malforteco de studentaj kluboj en okcidenta Eŭropo kaj la nekunlaboro de la forta Japana Esperanto-Ligo Studenta, ĝia agado fine preskaŭ tute koncentriĝis al orienta Eŭropo; ke pro sia interna nestabileco ĝi ne sukcesis plene sin dediĉi al siaj ĉefaj celoj, helpi la starigon de novaj universitataj kluboj, disvastigi Esperanton en la scienco kaj finkompili universitatan terminaron.

Surbaze de interkonsento en 1966 inter ISAE, TEJO kaj STELO, konstanta komisiono elektita de la Komitatoj de tiuj tri asocioj zorgas pri la kunordigo de studenta agado; STELO iĝis definitive faka sekcio de TEJO, same en nacia kadro studentoj formas Studentan Fakon de Landa Sekcio de TEJO. Post tri propraj Kongresoj inter 1966 kaj 1968, en Ruse (Bulgario), en Toruń (Pollando) kaj en Aix-en-Provence (Francio), STELO decidis en 1970 konsideri la Internaciajn Junularajn Kongresojn de TEJO ankaŭ kongresoj de studentoj, krome koncentriĝi al subteno de la Seminarioj en Toruń kaj utiligi la periodaĵojn de TEJO por informado al siaj membroj.

16.3.1.18 *Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (EŜLI).* — Societo de Esperantistaj Ŝakludantoj ekzistis jam en 1907, kaj du jarojn poste aperis en Barcelona la unua faka libro, *Sesdek Ŝakproblemoj*, de J. L. Paluzie, kun bona faka vortaro kvinlingva. *Esperanto*, la revuo de UEA, havis dum la 20'aj jaroj regule ŝakangulon.

La nuna EŜLI, fondita en 1958, celas grupigi ĉiujn ŝakistojn, kiuj scias Esperanton, kaj varbi por la Internacia Lingvo inter ŝakistoj en la tuta mondo. En la adresaro troviĝas jam preskaŭ 700 adresoj el 42 landoj. Ŝakaj rubrikoj aperis i.a. en *Esperanto*, *Nuntempa Bulgario* kaj *El Popola Ĉinio*.

16.3.1.19 *Monda Turismo.* — Se ekzistas unu kampo, al kiu direktiĝas la atento de multaj homoj el ĉiuj tavoloj kaj en kiu vaste sentiĝas bezono de pli facila interkomunikado, tiam ĝi estas sendube la turismo. Gravan rolon okupis turismo en la agado de UEA jam en la unuaj jaroj; ĝia Turisma Servo iniciatis la eldonon de multaj prospektoj kaj broŝuroj en la intermilitaj jaroj, kaj jam frue Landaj Asocioj organizis karavanojn al Universalaj Kongresoj.

Post la lasta milito konsiderinde plimultiĝas la nombro de esperantlingvaj turismaj prospektoj, de filmoj, de specialaj Esperantoaranĝoj kun pure turisma karaktero, kaj dank' al karavanoj el ekster Eŭropo pliinternaciiĝis la partoprenantaro de la kongresoj de UEA. Oni taksas, ke ĉ. 700 turismaj organizaĵoj tra la mondo plimalpli regule uzas la Internacian Lingvon. La fervojaj administracioj de pluraj eŭropaj ŝtatoj enmetis esperantlingvajn klarigojn en siajn horarojn aŭ aliajn informilojn.

Sed longe mankis la necesa kunordigo, unuflanke por informi la esperantistojn pri la disponeblaj prospektoj, aliflanke por atentigi la turismajn instancojn pri ekspluatebla rezervujo, la Esperanto-Movado. Tamen, jam antaŭ kelkaj jaroj Internacia Federacio de Ĵurnalistoj kaj Verkistoj de la Turismo akceptis Esperanton kaj kelkfoje uzis ĝin, kaj en 1966 la Internacia Akademio de Turismo decidis enketi pri la situacio de Esperanto en internacia turismo.

Intertempe — en la Internacia Jaro de Turismo (1967) — naskiĝis la revuo *Esperanto-Turismo*, kies abonantoj samjare decidis starigi **Internacian Turisman Esperanto-Asocion (ITEA), sed tiu ne sukcesis** efike ekagi. Aliflanke kreskis en 1967 la nombro de turismaj fakdelegitoj de UEA, kiuj estas nun pli ol 200. TEJO starigis Turisman Servon, unuavice por informi gejunulojn pri „iliaj" aranĝoj.

En oktobro 1968, studinte la rezulton de sia enketo, Internacia Akademio de Turismo unuanime akceptis Esperanton por sia *Vortaro de Turismo* kaj konfidis al sia koresponda membro D-ro Hj. Unger la taskon prepari la Esperanto-parton. Por pliseriozigi la prezentiĝon de la Esperanto-Movado antaŭ la turisma industrio kaj por substreki, ke Esperanto estas vaste konata kaj bone funkcianta lingvo, kiu penetris en la praktikan vivon, Unger lanĉis en julio 1969 grandformatan, ilustritan gazeton, *Turista Mondo* („Esperanto-Revuo de la 4 Sezonoj").

Por helpi al parolantoj de la Internacia Lingvo dum vojaĝoj kaj fari Esperanton konata en turismaj rondoj, dum la Viena Kongreso (1970) estis fondita, kun helpo de la Komitato de UEA, nova organizaĵo „Monda Turismo". Laŭ la vortoj de sia prezidanto Erik Carlén, ĝi celas „fariĝi ia tre utila sindikato por turistoj egale ĉu esperantistoj aŭ ne". Por la membroj ĝi eldonas i.a. kofrajn etikedojn, kaj al

rekomendindaj entreprenoj oni disponigos afiŝetojn kun la teksto „Rekomendata de Monda Turismo. Esperanto".

Ekde 1971 la Jarlibro de UEA listigas la adresojn de ĉiuj turismaj oficejoj, kiuj aperigis Esperantajn eldonaĵojn. En 1964 ekaperis en Bulgario lukse ekipita revuo *Ripozoj*. Menciinda estas ankaŭ *Esperanta-Hungara Turista Vortaro* de Alfonz Pechan, aperinta en 1968.

16.3.1.20 *Veterana Esperantista Klubo (VEK).* — „Honorigo de vivantaj frujaraj batalintoj, kiuj restas fidelaj al nia idealo", estas la ĉefa celo de VEK, kiu fakte funkcias nur per sia jarkunveno dum Universala Kongreso. En tiu de Vieno estis proponite, ke ĉiu veterano testamentu heredaĵon al la Movado. Inter la 714 membroj de VEK estas 13 pioniroj el la pasinta jarcento.

16.3.2 Neneŭtralaj Organizaĵoj

16.3.2.1 *Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE).* — IKUE estis fondita de pastro Richardson en 1910 surbaze de preparlaboroj de pastro Emile Peltier (1870-1909), kiu en decembro 1902 fondis societon *Espero Katolika* (EK) kaj eldonis en oktobro 1903 la unuan numeron de monata revuo kun sama nomo. En 1906 revuo kaj agado ricevis benon de Papo Pio X (kiel poste de ĉiuj Papoj ĝis Paŭlo VI), en la sama jaro estis permesitaj unuaj prediko kaj diservo (1-an de septembro 1906 en Ĝenevo) en Esperanto. En septembro 1924 EK fariĝis organo de IKUE. La unua IKUE-kongreso okazis en 1910 en Parizo, la 32-a estis komuna kongreso kun KELI (1968 en Limburg/Germanio). Nun IKUE regule aranĝas kongresojn ĉiun duan jaron. Ĝi havas nun ĉ. 1.300 membrojn, inter ili multajn en socialistaj landoj. Por ili funkcias „Fonduso Nepagipovaj Landoj". En 1966 J. A. Tuinder fariĝis prezidanto. Li iniciatis „Agadon E 3" (Esperantistoj esperigas esperantojn), kiu dum 3 jaroj kolektis 25.000 nederlandajn guldenojn por aĉeti okulkuracan aŭtomobil-klinikon por nenecese blindaj afrikanoj. Alia aktiveco estas „Biblia Fonduso" (de 1961) por ebligi katolikan eldonon de la Nova Testamento. IKUE havas plurajn landajn sekciojn kaj reton de „konsuloj", sacerdotan rondon „Pio X" (kun kelkaj episkopoj), eldonas okaze broŝurojn kaj librojn, pli-malpli regule ankaŭ propran jarlibron. En 1934 fondiĝis Internacia Katolika Informejo (IKI), kiu eldonas trimonatan revuon *Vojo - Vero - Vivo* por informi nekatolikojn kaj eldoni ekleziajn dokumentojn. IKI ne estas organize ligita kun IKUE. — Dum la 31-a IKUE-kongreso en St. Gallen (1966) IKUE akceptis novan statuton. Esperanto post la Dua Vatikana Koncilio estis oficiale agnoskita kiel liturgia lingvo de la Vatikano.

16.3.2.2 *Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI).* — En februaro 1908 germana inĝeniero Paul Hübner (1881-1970) komencis eldoni „Monatajn Raportojn pri la disvastiĝo de Esperanto inter la Kristanaj Unuiĝoj de Junaj Viroj" (YMCA). Ekde januaro 1909 tiu tre modesta revueto portas la nomon *Dia Regno* kaj ĉirkaŭ ĝi kolektiĝas iom post iom kelkcent esperantistoj, kiuj deziras uzi Esperanton por faciligi la ekumenajn rilatojn en internaciaj kristanaj movadoj kaj kiel ligilon inter protestantaj kristanoj por krei efikan kontakton inter diverslandaj samkredanoj. Laŭ instigo de William Page (Brito) kaj Wiebe Cnossen (Nederlandano) KELI estis fondita en 1911 dum la UK en Antverpeno.

La Unua Mondmilito estingis preskaŭ ĉiun agadon. Post la milito la gazeto *Kristana Espero*, eldono de la finnlanda pastoro H. Pätiälä, fariĝis la centro por la aktivecoj de KELI. *Dia Regno* aperis kiel aldono al tiu gazeto.

Pro la ekonomia katastrofo en Germanio Paul Hübner devis ĉesigi ĉiun agadon por Esperanto kaj por KELI en 1924, kaj daŭris ĝis 1926 (UK en Edinburgo), antaŭ ol KELI estis restarigita de la Brito H. Luyken. La subita kaj granda ekflorado de la Esperanto-Movado en Nederlando (ĉ. 1930) definitive savis KELI. La nederlanda branĉo garantiis la aperadon de *Dia Regno* kaj forte stimulis la fondon de KELI-sekcioj en aliaj landoj. Post la Dua Mondmilito la sveda fariĝis la plej forta. De 1947 KELI organizas siajn ĉiujarajn kongresojn, kaj multaj anoj praktikas tiun „efikan kontakton", pri kiu revis la fondintoj.

KELI eldonas broŝurojn, himnarojn, flugfoliojn, kaj, okaze de gravaj interkristanaj eventoj, varbilojn por Esperanto. Tre grava fariĝis ankaŭ la materia interhelpo por „fratoj en bezono" kaj la vasta korespondado. Prezidantoj post la milito estis E. Carlén (1948-55), H. A. de Hoog (1955-61), kiu verkis Historion de KELI, kaj A. Burkhardt (1961-). La sekretariejo troviĝas en Nederlando.

Lastatempe la protestantoj de KELI pli ofte kunlaboris kun la katolikoj de IKUE: Okazis du komunaj kongresoj, en Limburg (1968) kaj Klagenfurt (1970), kaj aperis ĝis nun du komunaj eldonoj de *Dia Regno* kaj *Espero Katolika* sub la titolo *Kristana Esperanto-Revuo*. En 1971 aperis la internacia kristana himnaro *Adoru Kantante* (kun gramofona disko), por kiu internacia komitato laboris ok jarojn.

16.3.2.3 *Kvakera Esperantista Societo (KES).* — La Religia Societo de Amikoj aŭ Kvakeroj ne havas konsekritajn pastrojn, ĉar ĉiu membro rajtas tiel servi. Ili kredas ke ĉiu homo sen ia distingo havas ion el Dio. La diservoj baziĝas sur silento por meditado kaj komunikiĝo kun Dio. Kvakeroj volas kunlabori kun ĉiuj homoj de

bona volo, senkonsidere al ties konceptoj, filozofioj kaj religioj.

KES fondiĝis en 1921. Dum la 20'aj jaroj Montagu C. Butler kaj aliaj aktivuloj de KES vizitis multajn kvakerajn lernejojn en Britio kaj prelegis pri la celoj de Esperanto. Kunvenoj de KES okazas regule dum Universalaj Kongresoj. Pluraj kvakeraj libroj estas tradukitaj en Esperanton, taŭgaj por infanoj kiel ankaŭ por plenkreskuloj.

Nuntempe la societo havas ĉ. 200 membrojn en trideko da landoj, al kiuj ĉiun trian monaton estas sendata la gazeto *Kvakera Esperantisto.*

16.3.2.4 *Frateca Esperantista Movado (FEM).* — Tiu ĉi movado funkciis jam en 1936, sed ĉesis ekzisti pro la internacia situacio. Ĝi estis refondita en somero 1970, agante en la kadro de la movado JEAN. La celo de FEM estas i.a. „konsciigi ĉiujn homajn estulojn pri la profunda solidareco kiu unuigas ilin kaj pri la neceso de ĝusta pensmaniero por efektivigo de pli bona vivo por ĉiuj en ĉiuj partoj de la mondo".

16.4 ALIAJ SPECIALIGITAJ ORGANIZAĴOJ

16.4.1 Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj (IUEF)

La Unuiĝo estis fondita en 1963 dum la 48-a Universala Kongreso en Sofio, kiel sekcio de ISAE. Ĝia prezidanto estas la Bulgaro Atanas D. Atanasov, kiu verkis la fundamentan artikolon „Utiligo de Esperanto por filologiaj studoj" *(Monda Kulturo,* 1963, n-ro 5, p. 133-136).

Laŭ sia statuto, IUEF havas jenajn celojn: a) Unuigi la esperantistojn-filologojn por kunordigita laboro pri filologiaj temoj kaj por reciproka interhelpo en iliaj sciencaj okupoj. b) Entrepreni studojn kaj esplorojn pri esperantologiaj temoj. c) Organizi kolektadon de folkloraj kaj lingvistikaj materialoj el diversaj nacioj. ĉ) **Manifesti** antaŭ filologiaj eksteresperantaj medioj la rezultojn de sia agado kaj la avantaĝojn de Esperanto **por internacia scienca kunlaborado.** Fine de 1970 IUEF havis 86 regulajn, 51 kunlaborajn kaj 1 helpan membrojn en entute 23 landoj. Sep membroj konsistigas la Gvidan Komitaton.

Fakajn problemojn traktas regula *Cirkulero* al la membroj kaj la kunvenoj dum UK. En septembro 1970 aperis speciala, filologia numero de *Scienca Revuo,* redaktita de Atanasov.

16.4.2 Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio (IPTEA)

Jam frue la Internacia Lingvo penetris ankaŭ en la medion de poŝto, telegrafio kaj telefono: En 1892/93 oni sendadis en Ruslando telegramojn en Esperanto, kaj iom post iom naciaj poŝt-administracioj akceptis Esperanton kiel klaran lingvon en telegrafo. La akceptiĝo de Esperanto kiel klara lingvo fare de Ligo de Nacioj en 1924 kaj de Universala Telegrafa Unio en 1925 estis la unuaj interŝtataj rekonoj de Esperanto kiel funkcianta lingvo. Multaj ŝtatoj aplikis ĝin en poŝto, eldonante ĉu poŝtmarkojn pri aŭ en Esperanto aŭ poŝtkartojn kun esperantlingva teksto. En 1911 fondiĝis Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝtistoj, Telegrafistoj kaj Telefonistoj, kies daŭriganto estas la nuna IPTEA, fondita en 1966. Ĝi havas ĉ. 700 membrojn en ĉ. 30 landoj, el ili pli ol 300 en Bulgario. En la organo *Interligilo*, aperanta en 850 ekzempleroj, troviĝas telekomunikada terminaro (Esperanta-angla-germana-rusa) de A. Jauŝkin.

En 1969 la Ministroj de Komunikado de Bulgario kaj de Latvio interŝanĝis esperantlingvajn leterojn.

16.4.3 Universala Ligo (UL)

Por disvastigi la ideon de mondfederacio inter esperantistoj, UL estis fondita en sekreta kunveno la 14-an de aprilo 1942 dum la germana okupo de Nederlando. Iniciatintoj kaj multjaraj gvidantoj estis Julia Isbrucker kaj Andreo Cseh; ĝia unua prezidanto estis Edmond Privat. UL konsideras kiel sian ĉefan taskon la konstruon de bazo por iu formo de mondfederacio, nome la pacan interrilatadon de ĉiuj popoloj; politikajn flankojn de la formota federacio ĝi lasas al kompetentaj politikistoj. UL aliĝis al UEA kaj al la Tutmonda Asocio de Mondfederalistoj, havis sian Centran Oficejon en Hago (en domo, kie samtempe funkciis Internacia Esperanto-Instituto) kaj eldonis la revuon *La Praktiko*, fonditan jam en 1932. Por faciligi pagojn UL uzis t.n. stelokuponojn kaj poste farigis ankaŭ monerojn en valoro de 1, 5 kaj 10 steloj.

En 1962 UL havis 2.000 aktivajn membrojn kaj 11.000 ordinarajn membrojn (apogantojn, kiuj unufoje pagis la sumon de 4 steloj). En la 50'aj kaj komence de la 60'aj jaroj UL estis sufiĉe aktiva, ĝiaj gvidantoj regule partoprenis en mondfederalistaj kongresoj, kaj *La Praktiko* ĝuis pro sia facila kaj alloga enhavo konsiderindan ŝaton inter la esperantistoj.

En 1964, laŭ la peto de Internacia Esperanto-Instituto kaj UL, UEA transprenis la revuon *La Praktiko*. Konforme al la kontrakto, la CO de UEA transprenis ankaŭ la administradon de la kotizoj kaj

abonoj de UL-membroj. Sian rajton disponi pri unu paĝo en ĉiu numero de *La Praktiko* por oficialaj informoj al la membraro, UL tamen delonge ne plu uzis. Poste, s-ro A. Cseh deziris nuligi la kontrakton kaj rehavi la gazeton por UL, kvankam UL praktike ĉesis aktivi. Okazis sufiĉe longaj intertraktadoj, ĉar UEA havis kreditojn ĉe UL, kaŭzitajn pro la plenumado de la kontrakto fare de UEA. Kiam, fine, tiuj kreditoj estis pagitaj en la alteco de interkonsentita sumo, UEA plenumis la deziron de s-ro Cseh kaj ĉesigis la aperigadon de la gazeto fine de 1970. Tamen, UL ne daŭrigis la publikigadon, kaj *La Praktiko* ne plu aperas.

16.4.4 Mondpaca Esperantista Movado (MEM)

Sub influo de Tutmonda Kongreso de la Popoloj por Paco, okazinta en Vieno fine de decembro 1952, MEM estis fondita la 6-an de septembro 1953 en la aŭstra urbo Sankt Pölten. Ĝia ĉefa iniciatinto estis Anton Balague (1912-1970), laŭdevene Kataluno, eksinstruisto loĝanta en Aŭstrio. Liaj plej proksimaj kunlaborantoj estis la Ĉeĥo Rudolf Burda (1902-1968), la unua prezidanto de MEM, la Svedoj Gösta Holmkvist kaj Karl Kvist, la Franco William Gilbert, nun centra redaktoro de *Paco*, la Hungaro Pál Balkányi (1894-), la Aŭstro Adolf Halbedl (1893-) kaj aliaj. En siaj unuaj jaroj, kiam Esperanto estis nefavorata en la popoldemokratioj, MEM plenumis utilan funkcion kiel forumo de esperantistoj en la socialismaj landoj.

Laŭ sia propra difino, MEM ne formiĝis kiel aparta nova internacia esperantista organizaĵo, por eviti splitiĝon en la tutmonda Esperanto-Movado; sekve, MEM-anoj aktivas en la kadro de jam ekzistantaj naciaj kaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj.

La bazaj principoj de MEM estas, laŭ art. 2 de la Statuto: „a) Militoj estas eviteblaj kaj evitendaj; b) La imperiismo, koloniismo kaj rasismo estas gravaj minacoj kontraŭ la mondpaco; c) MEM ne akceptas neŭtralecon pri ĉio koncernanta pacon aŭ militon. Ĝi apogas ĉiun agadon, kiu objektive celas la pacon; ĉ) MEM estas amasa senpartia movado." Ĉefaj celoj, laŭ art. 3, estas: „a) Unuigi ĉiujn esperantistojn, kiuj agadas por la mondpaco, sendepende de iliaj naciecoj, raso, religio, politika koncepto kaj membreco en iu ajn esperantista organizaĵo.

„b) Konforme al la principo 'Per Esperanto al Mondpaco', praktike utiligi Esperanton por la celoj de internacia kompreniĝo, reciproka fido, amikeco kaj paco.

„c) Serĉi kontaktojn kaj kunlaboron kun internaciaj kaj naciaj pacmovadoj."

Plej supera gvidinstanco estas la Konferenco, kiu okazas ĉiun

trian jaron. Ĝi elektas Internacian Komitaton de MEM, rajtas aprobi ŝanĝojn en la Statuto kaj elektas Sekretariaron, kiu gvidas la aferojn inter la Konferencoj.

MEM havas landajn sekciojn (komitatojn) kaj perantojn en ĉ. 40 landoj. Ĝi eldonas monatan organon, la revuon *Paco*, kiu laŭ unika sistemo aperigas ĉiun numeron en iu aparta lando. Por informi pri la praktika agado de MEM aperas ankaŭ, en Bulgario, la periodaĵo *Pacaktivulo*. La plej aktivaj sekcioj estas la bulgara, ĉeĥoslovaka, hungara, soveta, vjetnama, belga, franca kaj japana.

MEM kunlaboras kun diversaj pacmovadoj kaj organizaĵoj, esperantistaj kaj neesperantistaj, ekz. Tutmonda Pac-Konsilantaro (Helsinki), Konferenco pri Vjetnamo (Stockholm), „Kontraŭ A-kaj H-Bomboj" (Tokio), Nova Mobiliza Komitato (Vaŝingtono), Internacio de Militrezistantoj, Kristana Esperantista Ligo Internacia. Per okmembra delegacio MEM estis reprezentita en la Tutmonda Pac-Asembleo en Berlino (GDR) en 1969. Kunvenoj de MEM okazas tradicie en la kadro de la Universalaj Kongresoj.

La starpunkton de MEM resumis ĝia prezidanto, Nikola Aleksiev, jene: „Post la Dua Mondmilito la homaro vivas en cirkonstancoj de tre grava internacia streĉiĝo. La aktiveco de multmilionaj popolamasoj fariĝas ĉiam pli decida faktoro de la paco. La esperantistaro nature strebas al paco. MEM transformas tiun strebon en aktivan partoprenon en la landaj kaj internaciaj pacmovadoj."

16.4.5 Internacio de Militrezistantoj (IMR)

Kvankam pacifismo sendube estis grava elemento en la pensaro de Zamenhof kaj de la unuaj esperantistoj, la provoj aparte organizi esperantoparolantajn pacifistojn ne estis tre sukcesaj: En 1905 Gaston Moch fondis Internacian Socieon Esperantistan por la Paco, kiu eldonis revuon *Espero Pacifista*, jarlibrojn kaj la serion *Libraro Pacifisma*, sed jam tri jarojn poste li rezignis eĉ la ideon de internacia lingvo. Mallongviva estis ankaŭ Universala Pacifista Esperantista Ligo, fondita en 1923. Tamen, estas notinde, ke la fondinto de pacmovado, la nobel-premiito Alfred Hermann Fried (1864-1921), verkis unu el la unuaj Esperanto-lernolibroj por germanoj (1903); en 1907 li telegrafis el la Haga Konferenco al la 3-a Universala Kongreso en Cambridge: „El la falsa Pac-Konferenco mi salutas la veran Pac-Konferencon." La epokfara romano *For la Batalilojn!* de alia nobel-premiito, Bertha von Suttner, aperis en Esperanta traduko en 1914. Rezolucion por ĝenerala enkonduko de Esperanto adoptis la 16-a Internacia Pac-Kongreso en Munkeno (1907). Sed dum kaj post la Unua Mondmilito, se estis parolo pri mondaj problemoj,

en multaj naciaj Esperantogazetoj dominis ne pacifismaj, sed ofte preskaŭ ŝovinismaj artikoloj.

Pli solida uzo de Esperanto por la celoj de pacifismo okazis ekster la Esperanto-Movado: Internacio de Militrezistantoj, fondita en 1921 sub la Esperanta nomo „Paco", dekomence aplikis la Internacian Lingvon, eldonante ekde 1929 informbultenon *La Militrezistanto* kaj plurajn broŝurojn. Depost la Dua Mondmilito IMR organizas kunvenojn dum Universalaj Kongresoj; ĝia multjara prezidanto Harold F. Bing mem verkis Esperante, kaj en 1965 ekaperis kvaronjara IMR-bulteno *Militrezisto*.

16.4.6 Budhana Ligo Esperantista (BLE)

Budhanaj pastroj kaj studentoj en Japanio interesiĝis pri Esperanto en 1921, fondis universitatajn grupojn kaj eldonis revuetojn. Korespondado kun angla budhano kondukis en 1925 al fondo de „Budhana Rondo", kiu nomis sin en 1926 Budhana Ligo Esperantista kaj eldonis presitan revuon *La Budhismo* (1931-36). En Japanio fondiĝis en 1931 Japana Budhana Ligo Esperantista, sub kies aŭspicioj aperis pluraj revuoj kaj tradukoj de budhismaj verkoj.

De 1951 ĝis 1962 aperis *La Budha Lumo*, poste (ĝis nun) dumonata *Budhana Kuriero*. La japanaj membroj daŭre eldonas sian informilon *La Japana Budhano*. Budhana Esperanto-Ínstituto, en Cejlono, fondita en 1954 de Njanasatta Thero, prizorgis en 1956 per Esperanto informojn pri pribudhismaj verkoj el orienta Eŭropo por Enciklopedio de Budhismo, kun subteno de la cejlona registaro. Dalai Lama kaj Panĉen Lama akceptis en 1956 resp. 1957 esti patronoj de BLE.

16.4.7 Oomoto / Universala Homama Asocio (UHA)

„Oomoto estas la religio disvastiganta la Vorton de Dio, rivelitan al S-ino Nao Deguĉi (1836-1918) kaj S-ro Onisaburo Deguĉi (1871-1948), bofilo de Nao. Oomoto estas origine japana, sed karakterize universala. Ĝi alvokas al ĉiuj religioj manpremon kaj kunlaboron sub la standardo de la Unueco de Religioj."

En 1923, 31 jarojn post ĝia fondiĝo, Onisaburo adoptis Esperanton kiel oficialan lingvon por Oomoto por internacia agado, kaj baldaŭ fondiĝis Esperanto-Propaganda Asocio (EPA) por disvastigi la lingvon en Japanio. En 1925 li fondis Universalan Homaman Asocion (UHA) por atingi, „ke ĉiuj homoj unuiĝu laŭ la universala kredo je Dio kaj frateco de la homoj".

Ekde la sama jaro la esperantlingva revuo *Oomoto* (de 1926 ĝis 1932 krome *Oomoto Internacia)* aperadis kiel oficiala organo de

Oomoto kaj UHA. Por japanaj legantoj eldoniĝis la revuo *Verda Mondo* de EPA. La vigla aktiveco estis rompita pro la subpremo de la japana registaro kun la polico kontraŭ Oomoto en 1935.
La tuta organizo de Oomoto estis persekutata kaj la tuta agado estis malpermesita. Inter 1935 kaj 1945, tiu jardeko estis la periodo de la martireco de oomotanoj, kaj nepublika agado de oomotanaj esperantistoj.

En 1945, kiam la Dua Mondmilito finiĝis kaj la Oomoto-afero solviĝis post la vandalisma detruo al ĉiuj Oomoto-domoj, la religia aktiveco de Oomoto, kune kun la Esperanto-agado kaj la socia agado ekĝermis por nova florado.

La revuo *Oomoto* post longa interrompo aperis en 1950 kiel dumonata organo de Oomoto kaj UHA kaj ĝi atingis la 395-an numeron en decembro, 1973, kun vasta legantaro tra tuta Esperantujo kaj multaj kunlaborantoj el diversaj partoj de la mondo. EPA ankaŭ estis reorganizita por nova agado. Ĝi sinsekve organizis Esperanto-kursojn, ekspoziciojn, prelegojn k.s. en la centro kaj en pluraj regionoj de Japanio. La monata organo de EPA, sub nova titolo *Nova Vojo*, ekaperis en 1964.

Intertempe Oomoto komencis delegi ekde 1959 siajn reprezentantojn al la Universalaj Kongresoj de Esperanto, elektante aŭ veteranajn aŭ junajn esperantistojn, kiuj ĉiufoje prizorgas la fakan kunvenon de Oomoto en la kadro de la Kongresoj.

Okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro (1965) Oomoto decidis subteni la Proponon de Universala Esperanto-Asocio al la Unuiĝintaj Nacioj favore al Esperanto, kaj kolektis 147.355 individuajn subskribojn kaj 969 subskribojn de organizaĵoj kun 1.121.653 membroj. Paralele ĝi lanĉis la subskrib-kolektadon de EPA-Peticio al la Japana Parlamento por enkonduko de Esperanto en lernejojn kaj internaciajn rilatojn kun la rezulto de 275.316 individuaj subskriboj, kiuj estis poste transdonitaj al la Japana Parlamento per la apogo de kvindek parlamentanoj.

En tiu sama jaro Oomoto kunlaboris por sukcesigi la 50-an Universalan Kongreson de Esperanto en Tokio, post kiu ĝi organizis vigle aklamitan Oomoto-Festivalon.

La Oomoto-centron en Kameoka ofte vizitas esperantistoj, venintaj al Japanio. Sur ŝtona monumento, starigita en 1963, ĉe la enirejo de la domo de Oomoto ili legas la vortojn „Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo".

16.4.8 Martinus-Instituto

La spirit-scienca Martinus-Instituto en Kopenhago decidis en

1965 adopti Esperanton kiel oficialan internacian lingvon. Dum la pasintaj jaroj ĝi eldonis pli ol dek librojn pri sia kosmologio.

16.5 BIBLIOGRAFIO

„Internaciaj organizaĵoj esperantistaj". Serio de 17 artikoloj en *Germana Esperanto-Revuo*, vol. 15, 1962, n-ro 1, ĝis vol. 17, 1964, n-ro 7/8.

Wajsblum, Marek, *Historio de la fervojista Esperanto-Movado, 1908-1968*. Amsterdam 1968.

Kliemke, Ernst; Siegfried Liebeck k.a., *Esperanto und Recht*. Berlin 1928.

Székely, János, „Esperanto kaj juristoj". *Internacia Jura Revuo*, vol. 2, 1967, n-ro 2, p. 15-19.

Neergaard, Paul, „Retrospektiva rigardo al 50 jaroj da apliko de Esperanto en la scienco". *Sciencaj Studoj*. Kopenhago 1958, p. 9-19.

First International Conference on the Language Problem in Science and Learning (CED-Dok. J/II/1). London 1963.

Rust, George, „Historio pri la Esperanto-Biblio". *Biblia Revuo*, vol. 5, 1969, p. 261-278.

Murphy, F. Douglas, *Orjubileo de Skolta Esperantista Ligo, 1918-1968*. Ipswich 1968.

Pietrzak, Marek W., „Historio de la internacia studenta Esperanto-Movado". *II-a Internacia Esperanto-Seminario*. Toruń 1966, p. 59-67.

Nyanasatta Thera, *Esperanto in Ceylon and its position in international affairs, with special interest and significance for Buddhism*. Bandarawela 1963.

Hoen, N.G., *Emile Peltier, apostolo de katolika esperantismo*. Tilburg 1963.

de Hoog, H. A., *Nia historio. K.E.L.I. de 1911-1961*. 1964.

Kio estas MEM. Praha 1968.

Deguti, Kiotaro, *My travels in Esperanto-land*. Kameoka 1968.

ĈAPITRO 17

TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

17.1 KONTRIBUOJ DE LA JUNULARO AL LA PROGRESIGO DE ESPERANTO

En 1878, 19-jara junulo konfidis al kelkaj amikoj longe garditan sekreton, la projekton de nova lingvo. Du gimnazianoj impresis la unuan kongreson de parolantoj de tiu lingvo per sia bonega parolkapablo: Edmond Privat kaj Hector Hodler en 1905 en Bulonjo. Privat, 18-jara, prelegvojaĝis per Esperanto tra Usono en 1907/08, kaj Hodler, 19-jara, starigis en 1908 Universalan Esperanto-Asocion, dum la tiutempaj eminentuloj: generaloj, profesoroj, advokatoj, ankoraŭ senĉese diskutadis kiel plej taŭge organizi la kreskantan Movadon. Kaj 18-jara studento fondis, en 1902, la famiĝontan Esperantistan Klubon de Praha: Eduard Kühnl.

La junularo dekomence ludis elstaran rolon en la Esperanto-Movado, ofte agante, kion montras la supraj ekzemploj, eĉ kiel pioniroj, kiuj feliĉe kompletigis la entuziasmon ĝenerale komunan al la unuaj esperantistoj per la iniciatemo kaj laborforto propraj al gejunuloj. Kutime, ilia kunlaboro moviĝis en la kadro de la ĝenerala Movado kaj ne kondukis al apartaj junularaj organizaĵoj — kvankam ankaŭ sur tiu kampo Hodler kaj Privat agis modele, ekeldonante en 1903 la monatan *Juna Esperantisto*, kiu ĝis sia malapero en 1914 estis la unua ĉefa ligilo de junaj adeptoj de la Internacia Lingvo.

Provo de pli firma organiziĝo de gejunuloj estis Tutmonda Esperantista Junulara Asocio, kiu estis fondita en 1920 kaj aperigis ĝis 1929 la revuon *Esperantista Junularo*, sed poste malvigliĝis, malgraŭ diversaj klopodoj revivigi ĝin. Intertempe finiĝis la junaĝo

de la unuaj Esperantaj pioniroj, kaj dume al la Movado aliĝis novaj junaj homoj, pri kies ekzisto aŭ lingva perfektigo oni ofte ne tro interesiĝis. Fakte, tra la tuta historio de la junulara Esperanto-Movado treniĝas la problemo de la sinteno de aliaj, plenkreskulaj organizaĵoj kaj kvankam ĉiam estis personoj en UEA kaj en la Landaj Asocioj, kiuj komprenis la gravecon de la junularo kaj al kiuj ĝi dankas multajn atingojn, la problemo longe restis nesolvita.

17.2 TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO

Gesinjoroj van Veenendaal, instruista paro en Nederlando, estas la gepatroj de la nuna TEJO. En julio 1934 ili komencis eldoni kaj redakti revuon por junaj komencantoj, *La Juna Vivo;* sub la sama titolo aperis tri eldonoj de internacia lernolibreto. Por testi la rezultojn de tiuj siaj iniciatoj, gesinjoroj van Veenendaal kunvokis en aŭgusto 1938 Internacian Junularan Kunvenon (IJK) al la nederlanda urbeto Groet, instigitaj de renkontiĝo inter britaj kaj francaj lernantoj, kiu okazis iom pli ol unu jaron antaŭe en Birmingham. Kun 200 partoprenantoj el dek landoj, la Kunveno de Groet estis tiel sukcesa, ke la ĉeestantoj, laŭ sugesto de la geinstruistoj, entuziasme decidis fondi Tutmondan Junular-Organizon (TJO).

TJO deklaris sin „supertendenca" kaj nomis kiel siajn celojn:

a. Konsciigi la junularon pri tutmonda interfrateco kaj akceli ĝin pere de: 1. Propagando de la lingvo Esperanto inter la junularo de la tuta mondo, 2. aranĝado de internaciaj renkontiĝoj, 3. legado de komuna gazeto, 4. korespondado en Esperanto, 5. ĉiuj indaj rimedoj por interfratigi homojn de diversaj nacioj, religioj, rasoj kaj politikaj konceptoj.
b. Akceli, ke Esperanto estu akceptita en la lernejojn.

Unu jaron poste, en Tervuren (Belgio), okazis la 2-a IJK, kiun partoprenis eĉ ĉ. 400 gejunuloj. TJO ekprogresis sub la bonvolaj rigardoj de la Esperanto-Movado, sed fakte ne estis subtenata de ĝi. La etoson de la tiutempa „junularo esperantista" bele ilustras Junulara Marŝo el 1939:

Ni man' en man' en kolektiv'
Kantante iras al la viv'
Ni junular', tra kampo kaj arbar'.

Dudek ses jarojn post Groet, la prezentado de filmo pri la trakampa migrado de TJO-anoj kun verdaj flagoj multe amuzis tute novan generacion dum la 20-a IJK de TEJO en Amsterdam....

17 TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

La promesplena evoluo de TJO estis kruele interrompita per la Dua Mondmilito. En marto 1941 ĝia havaĵo en Nederlando estis konfiskita de la naziaj okupantoj.

Sed jam en aŭtuno 1945 *La Juna Vivo* reaperis, kaj TJO reaktiviĝis kun eĉ pli granda vervo. Diverslandaj reprezentantoj konferencis en aŭgusto 1946 por reorganizi la laboron kaj formuli Regularon. En aŭgusto 1947 TJO estis akceptita kiel faka organizaĵo de UEA, sed jam unu jaron poste la gvidantoj amare notis: „....intencan kaj entuziasman helpon ni ĝis nun ne povis konstati." En 1948 TJO kunfandiĝis kun alia organizaĵo, „Denaska Esperantistaro".

Laŭ sia postmilita Regularo, TJO havis i.a. aktivajn (14-30 j.) kaj aspirantajn membrojn (6-14 j.). La Estraro estis elektata de ĝenerala kunveno aŭ per referendumo de la aktivaj membroj. *La Juna Vivo* estis la oficiala organo, kaj de la Internaciaj Junularaj Kunvenoj, kiuj rekomencis okazi en 1947, oni postulis „festan kaj propagandan karakteron".

La gvidantoj de TJO estis ĝis ĉ. 1949 plenaĝuloj, plej ofte instruistoj, kaj la membraro konsistis plejparte el lernejanoj, kiuj lernis Esperanton en sia klaso. Sed post la 5-a IJK en Versailles (1949) vigliĝis la aktivado de la junula membraro mem. En la 6-a IJK en Konstanz partoprenis pli ol 400 gejunuloj; en la Estraron eniris pli junaj fortoj. La ĉefaj celoj de TJO tamen restis nur la regula aperigo de *La Juna Vivo* kaj la ĉiujara okazigo de IJK.

Tuj post sia nomŝanĝo je Tutmonda Esperantista Junular-Organizo (dum la 8-a IJK en Ry, Danlando, en 1952), la organizaĵo eniris gravan krizon. Al financaj malfacilaĵoj aldoniĝis interna malkonkordo kaj, sekve de tio, foriro de seniluziigitaj membroj kaj gvidantoj. Tiu krizo atingis sian kulminon en 1954, kiam TEJO alarmis kaj klopodis sekurigi al si subtenon flanke de la ĝenerala Movado, kiu aŭ pli-malpli ignoris sian junularon aŭ estis tro absorbita per siaj propraj problemoj por doni al ĝi pli efikan helpon.


17.3 TEJO KIEL JUNULARA SEKCIO DE UEA

17.3.1 Nova Organiza Strukturo

La 12-a IJK de TEJO en Büsum (FR Germanio) en 1956 inaŭguris novan etapon en la historio de la junulara Esperanto-Movado. La kongresanoj akceptis rezolucion, laŭ kiu TEJO estu la Junulara Sekcio de UEA, kaj sendis sepmembran delegacion al la 41-a Universala Kongreso en Kopenhago, kie la Tria Sekcio pridiskutis la temon „Esperanto kaj la Junularo". La konkludojn de la Sekcio akceptis la Komitato de UEA, fiksante apartajn kotizojn por junaj



Internaciaj Seminarioj de Germana Esperanto-Junularo (depost 1957), pro la aktuala temaro, kiun ili traktis, evoluis al prestiĝa junulara aranĝo, ne nur germana sed internaciskala. (Sur la foto: IS en Hamburgo, 1965).



"Kunloĝadoj", kiel japanaj gejunuloj baptis siajn intensajn lingvajn kursojn, estas populara kaj ofta agadformo de la junularo en tiu lando.

individuaj membroj de UEA kaj donante subvencion al TEJO, kiu baziĝis sur la principo de aŭtomata membreco, t.e. ke ĉiuj membroj de UEA havantaj malpli ol 25 jarojn estas membroj de TEJO. Samtempe oni esprimis la deziron, ke la sama principo de aŭtomata membreco estu aplikata ankaŭ por la rilatoj inter la Landaj Asocioj de UEA kaj la Landaj Sekcioj de TEJO. *La Juna Vivo* fariĝis, en novembro 1956, rubriko en la revuo *Esperanto*.

Por TEJO, kiu tiam havis 600 individuajn membrojn, finiĝis la periodo de memstareco kaj daŭgera izoliteco. UEA, dume, komencis doni pli grandan atenton al asekuro de sia estonteco. La nova organiza strukturo de TEJO estis sendube unu decida antaŭkondiĉo por pliaktivigi la junularan agadon por (kaj per) Esperanto, malfermante antaŭ la Movado kaj la junularo mem pli grandajn eblecojn de efika agado ol antaŭe. La nova Statuto de TEJO, kiun helpis kompili la Ĝenerala Sekretario de UEA, D-ro Ivo Lapenna, estis aprobita de la Komitato de UEA dum la 42-a UK en Marseille (1957). Pri la nova aranĝo UEA informis la Landajn Asociojn, sed, bedaŭrinde, multaj LA longan tempon restis surdaj je la alvoko starigi junularan sekcion aŭ kunlabori — laŭ la modelo de UEA/TEJO — kun jam ekzistanta.

17.3.2 Unuaj Paŝoj al Vera Tutmondeco

En 1958, TEJO havis Landajn Sekciojn (LS) en Brazilo, Bulgario, Francio, FR Germanio, Italio, Maroko, Nederlando, Svedio, Svislando kaj Urugvajo. Por plifortigi siajn kontaktojn kun la renaskiĝanta Movado en orienteŭropaj landoj, TEJO sendis en 1957 fortan delegacion al la Esperanto-kunveno okazanta en la kadro de la Junulara Festivalo en Moskvo.

Dum la 14-a IJK en Homburg (FR Germanio), la provizora komisiono de Büsum cedis lokon al laŭstatute elektita Estraro, en kiu Günther Becker kaj Nicola Minnaja transprenis la postenojn de prezidanto kaj ĝenerala sekretario. Pro siaj grandaj meritoj por la pliproksimigo de UEA kaj TEJO, D-ro Lapenna estis nomita Honora Membro de TEJO. Aliĝis sekcioj en Hispanio kaj Jugoslavio, kaj komenciĝis kontaktoj i.a. kun Hungario kaj Koreo.

Unu jaron poste, en 1959, TEJO unuafoje kongresis en socialisma lando: la 15-an IJK en Gdańsk (Pollando) brile organizis Marek W. Pietrzak (1938-68), la fondinto kaj unua prezidanto de Pola Esperanto-Junularo, kaj partoprenis ĝin tricento da gejunuloj. Pietrzak eniris la Estraron kiel vicprezidanto; precipe dum sia ofic-periodo kiel ĝenerala sekretario (1961-63) li multe kontribuis al la vastigo de la aktivadoj kaj prestiĝo de TEJO. Ankaŭ en 1959, Humphrey Tonkin

kaj John C. Wells fondis Junularon Esperantistan Britan, kiu titolis sian bultenon: *Kial Ne?*

La 16-a Internacia Junulara Kongreso (tiel nun, anstataŭ Kunveno) en Rotterdam markis la finon de tiu periodo, en kiu la ĉefa laborcelo de la Estraro estis la interna reorganizo. Komenciĝis nova periodo, dum kiu TEJO efektive plenumas siajn taskojn paralele kun aliaj instancoj de la Movado. La unuaj punktoj de ampleksa laborplano por la venontaj jaroj temis pri informado al neesperantistaj junularaj organizaĵoj (NEJOj) kaj pri ellaboro de modela teksto por nacilingvaj varbfolioj porjunularaj. Tiun tekston poste utiligis i.a. la germana kaj itala sekcioj por sia enlanda informa agado. Al la Statuto kaj Kongresa Regularo aldoniĝis en 1961 Regularo pri Korespondaj Servoj de Landaj Sekcioj kaj Regularo pri Informa Agado.

Dum la 17-a IJK (1961) sep LS de TEJO (la bulgara, franca, okcident-germana, hispana, jugoslavia, pola kaj sveda) subskribis Deklaron de Wokingham, kiu celis pliproksimigi la kunlaboron inter la ekzistantaj LS kaj helpi la fondon de novaj sekcioj. Anglalingva broŝuro pri la Kongreso de Wokingham estis dissendita al ĉiuj gravaj internaciaj junularaj organizaĵoj.

En 1962 elstaris tre gravaj kunsidoj de la Komitato de TEJO dum la 18-a IJK en la sveda urbo Ystad. La ĉefaj atingoj estis la Unua Perspektiva Laborplano de TEJO, surbaze de kiu multaj LS prilaboris siajn agadplanojn, kaj la Kontrakto de Ystad, per kiu la LS interkonsentis delegi reprezentantojn al alilandaj junularaj Esperanto-aranĝoj. Krome, la NEJO-agado estis formulita kiel speciala kampanjo, kaj en 1962 TEJO faris grandan paŝon al tutmondeco, ĝis tiam nur laŭnoma: aliĝis al ĝi nove fonditaj sekcioj en Japanio, Madagaskaro kaj Usono.

17.3.3 „Jaro de la Junularo"

La jaro 1963 pasis sub la signo de „Jaro de la Junularo en la Esperanto-Movado", kiun kune proklamis UEA kaj TEJO. Ĝi esence kreskigis la interesiĝon pri junulara agado inter plenaĝuloj, plifortigis la helpon de UEA al TEJO kaj — nelaste — akcelis la junularan aktivecon mem. Ĝiaj kulminaj eventoj estis la 19-a IJK en Vraca (Bulgario), kiun partoprenis 540 gejunuloj el 22 landoj, kaj la Unua Ĝenerala Kunveno dum la 48-a UK en Sofio pri „La Internacia Lingvo kaj la Nuntempa Junularo".

Tuj antaŭ tiuj Kongresoj aperis la unua numero de nova revuo de TEJO, *Kontakto*, per kiu TEJO celis ne simple liveri, kiel klarigis Tonkin, „nur ankoraŭ alian novaĵ-foliaron aŭ anoncaron, sed veran gazeton, kies enhavo ne pritraktu simple Esperanton, sed ankaŭ

tiujn problemojn, kulturajn kaj sociajn, kiuj tuŝas la junularon, kaj tiujn apartajn interesojn kiujn havas gejunuloj". Venkinte sennombrajn malfacilaĵojn, financajn kaj teknikajn, *Kontakto* nun gajnas pli kaj pli da reputacio kaj jam okupas nekontestatan pozicion en la Esperanta gazetaro. Dank' al la komprenemo de la Komitato de UEA en Sofio, estis farita nova financa aranĝo inter UEA kaj TEJO, laŭ kiu *Kontakto* estas senpage liverata al la individuaj membroj de UEA sub 25 jaroj kaj TEJO ricevas duonon de iliaj kotizoj. Por povi plene profiti tiun aranĝon, TEJO tamen devas konstante zorgi pri altigo de la nombro de junaj individuaj membroj de UEA.

Pliaj atingoj de la Junulara Jaro estis la aliĝo de sekcioj en Hungario, Suda Koreo kaj Aŭstralio, tiel ke TEJO komence de 1964 havis Landajn Sekciojn en 18 landoj, kaj oficialaj interparoloj de TEJO-reprezentantoj kun Monda Junulara Asembleo (Bruselo), Monda Federacio de Demokrata Junularo (Budapeŝto) kaj Internacia Studenta Unio (Prago), en vintro 1963/64. Dum tiu tempo plialtiĝis, laŭnombre kaj laŭkvalite, ankaŭ oratoraj konkursoj kaj kulturaj aranĝoj en landa skalo, ekz. la Internaciaj Seminarioj de Germana Esperanto-Junularo, regule okazantaj dum la jarfinaj tagoj.

17.3.4 Kvin Jaroj de Sukcesoj kaj Deficito

La jaro 1964 estas signifoplena pro la komenciĝo de sistema kaj preskaŭ profesi-nivela NEJO-agado. Pluraj internaciaj junularaj organizaĵoj estis reprezentitaj dum la 20-a IJK en Amsterdam, pri kiu poste aperis franclingva dokumentaro. TEJO ekeldonis informservon en la angla kaj franca lingvoj, kaj personaj kontaktoj inter reprezentantoj de TEJO kaj de aliaj organizaĵoj okazis en Eŭropo, Usono kaj Japanio. De tiam, ĉiujare delegitoj aŭ observantoj de TEJO aperis ĉe internaciaj kongresoj de NEJOj en diversaj lokoj de la mondo.

Günther Becker, elektita kiel Ĝenerala Sekretario de UEA, cedis en 1964 sian lokon al Ivo Osibov; pro siaj grandaj meritoj li estis nomita Honora Prezidanto de TEJO. Nove eniris la Estraron unuafoje Japano, Umeda joŝimi. La Komitato de UEA kreis la funkcion de Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA, kun ĉiuj rajtoj de Estrarano krom la voĉdona. Sur nacia nivelo, pluraj LS interŝanĝis delegitojn aŭ aranĝis komunajn renkontiĝojn, ekz. de Germanoj kaj Jugoslavoj, de Aŭstroj, Italoj kaj Jugoslavoj.

En 1965, por la unua fojo TEJO-Kongreso okazis en ekster-eŭropa lando: en Oocu (Japanio), kun 261 partoprenantoj el 15 landoj. Hans Bakker, kiel nova estrarano, nun sola transprenis la prizorgadon de eksteraj rilatoj (kun ĉ. 80 NEJOj), kies aktualan staton li kronikis per daŭre ĝisdatigata NEJO-Dosiero. En septembro 1965

17.3 TEJO KIEL JUNULARA SEKCIO DE UEA

TEJO organizis Seminarion pri Lingva Problemo en Internaciaj Junularaj Rilatoj en Podvin ĉe Ljubljana, sub la aŭspicioj de Jugoslavia Unesko-Komisiono. Kiel eksperimento, tiu seminario estis tre sukcesa, ne nur ĉar dek internaciaj organizaĵoj partoprenis en ĝi, sed ankaŭ ĉar la raporto pri la seminariaj debatoj pligrandigis la prestiĝon de TEJO ĉe la kolegaj asocioj.

Alia nova iniciato estis seminario por eduko de gvidantoj, kiu unuafoje okazis fine de 1965 en Hamburgo. La origina ideo de tiuj seminarioj estis: transdoni spertojn de nunaj al estontaj funkciuloj de TEJO aŭ de LS, sed jam en 1966 la NEJO-Komisiono komencis organizi apartajn „gvidseminariojn" por funkciuloj de neesperantistaj junularaj organizaĵoj. Tia interŝanĝo de spertoj kaj administra tekniko plenigis mankon forte sentatan inter junularaj organizaĵoj, kaj TEJO per tio reliefiĝis kiel asocio, kiu parolas ne nur pri Esperanto aŭ la lingva problemo, sed ankaŭ kapablas doni konsilojn kaj konkretan helpon pri la organiza praktiko. Kvankam skuata per konstantaj financaj malfacilaĵoj, TEJO demonstris okulfrape al esperantistoj kaj neesperantistoj, kian efikon povas atingi relative malgranda taĉmento de amatoroj. Aldone al tio, la kunagado de Estraranoj kaj Komitatanoj de TEJO distingiĝis per unika solidareco kaj per manko de tiaj energirabaj personaj konfliktoj, kiajn tiel ofte spertadis la plenkreskula Movado.

La jaron 1966 karakterizis du superlativoj: la rekorda partopreno en la 22-a IJK en Pécs (Hungario), kiun ĉeestis pli ol 900 gejunuloj el 22 landoj kaj al kiu la aŭtoritatoj grandskale donis atenton, kaj — la senprecedence granda deficito de TEJO!

Tonkin ellaboris laborplanon por lerneja agado, kiu celis fermi la breĉon inter enlerneja agado kaj eksterlerneja meminiciata aktivado de TEJO, sed ne havis tujan praktikan sekvon. Aliflanke, ISAE, STELO kaj TEJO formis konstantan komisionon por kunordigi la agadon inter studentoj. Krome, TEJO iĝis koresponda membro de Kunordiga Komisiono pri Internacia Volontula Servado ĉe Unesko. Al la jam tradicia instruado de Esperanto al junularaj laborbrigadoj (i.a. en Jugoslavio kaj Bulgario) aldoniĝis nun ankaŭ kursoj por volontuloj en Francio, en la t.n. Muelejoj de Metilernantoj. Aliĝis sekcioj en Argentino kaj Novzelando, „gvidseminarioj" okazis ankaŭ en Japanio kaj Usono, kreiĝis Turisma Servo de TEJO, kaj en Argentino estis fondita „Programo Pasporto" por ebligi la ĉefamilian interŝanĝon de gejunuloj.

Kiel nova ĝenerala sekretario, Tonkin revivigis en oktobro 1966 la *Informfolion* (InFo) de TEJO, kiu estis iniciatita de Pietrzak en 1962 kiel ligilo inter la Estraro, Komitato kaj LS de TEJO. Ĝi aperas ĉiun duan monaton kaj, de 1968, estas multobligata kaj ekspedata de


la Centra Oficejo de UEA. De februaro 1968 aperas, same dumonata, bulteno *Novaĵoj* por liveri al la Esperanta gazetaro aktualajn informojn pri junulara aktiveco tutmonde. Ĝiaj angla- kaj franclingva ekvivalentoj — ekde 1971 ankaŭ eldonoj en la germana, itala kaj hispana lingvoj — estas regule distribuataj al neesperantistaj organizaĵoj.

Laŭ nekompleta statistiko de la Turisma Servo de TEJO, en 1967 proks. 2.700 gejunuloj partoprenis 22 junularajn aranĝojn. Pri la planataj la Servo publikigas superrigardon komence de ĉiu jaro. La plej gravajn renkontiĝojn TEJO decidis aŭspicii; kiel unuajn, en 1967, Renkontiĝon de Eŭropa Esperantista Junularo en Montecatini (Italio), Internacian Kunvenon en Natanja (Israelo) kaj Seminarion por Eduko de Gvidantoj en Ĉeĥoslovakio. La Turisma Servo okazigis seminarion pri „Esperanto kaj turismo" en Pollando, dum la tiujara TEJO-Kongreso devis, pro la milito en Mezoriento, okazi en la kadro de la 52-a UK en Rotterdam. En somero 1967 la NEJO-Komisiono prizorgis kvin kursojn ĉe volontulaj tendaroj en Francio kaj unu en Nederlando; unu grava flanka rezulto estas la esplorado pri testado kaj edukaj metodoj en Esperanto. El la laboro de la NEJO-Komisiono formiĝis krome Konsulta Centro pri la Lingva Problemo en Internaciaj Junularaj Rilatoj, kiu havas juran personecon en Nederlando. Al Skolta Esperantista Ligo TEJO donis helpon per informado pri la Internacia Ĵamboreo.


La rajton pri senobstakla vojaĝado, kiun ja aparte deziras profiti TEJO-anoj, akcentis la Kongresa Rezolucio de la 24-a IJK en Tarragona (Hispanio) en 1968. Tiujare TEJO denove organizis sukcesan seminarion por eduko de gvidantoj kaj kursojn en internaciaj labortendaroj. Speciala trilingva numero de *Kontakto* pri tiaj kursoj vekis tre favorajn reagojn. Per vigla varbado la deficito povis esti iom reduktita, sed la kriza financa situacio plue bremsis la laboron de la organizaĵo. Aliflanke, la Centra Oficejo de UEA transprenis pli da rutinaj administraj laboroj por TEJO.

17.3.5 Deklaracio de Tyresö

La profundaj sociaj ŝanĝoj kaj la vekiĝo de la tutmonda junularo dum la pasintaj jaroj ne pretiriris ankaŭ la internon de TEJO. Ĝi komprenis, ke en la nuna monda situacio, kiam la junularo fariĝas politika kaj ekonomia forto ĉiam pli potenca kaj kiam la interesoj kaj moralaj sentoj de la junularo plivastiĝas, necesas ankaŭ vastigi la fundamentajn principojn, sur kiuj la junulara Esperanto-Movado konstruas siajn organizajn formojn. TEJO, sekve, fariĝis pli aktiva kaj agema, kaj precipe pli socie respondeca, en ĉiuj flankoj de la agado. Organizo, kiu laborus por lingvo, sed ignorus la premojn kaj



Supre: En la 29-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO (en Sarajevo, 1973) oni debatis pri la temo "Junularo kaj la hommedio".



Kontakto, la kvaronjara revuo de la junulara sekcio de UEA, de jaro al jaro pligrandigas sian prestiĝon.

fluojn, kiuj muldas aŭ detruas tiun lingvon, prave perdus sian ekzistorajton kaj sian apogon. Antaŭ la vojkruciĝo, TEJO tion komprenis kaj sekvis la vojon al socia aktiviĝo.

Rezulto de tiuj konsideroj estis

Deklaracio

akceptita de la partoprenantoj al la 25-a Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo en Tyresö, Svedio, la 3-an - 10-an de aŭgusto 1969.

En pluraj prelegoj kaj diskutgrupoj kun la ĝenerala temo „Junularo kaj Socio" ni pristudis la nuntempan radikalan ŝanĝon de la rolo de la junularo en la socio, kiu montriĝas en intelekta kaj politika mobilizo de la junularo.

La mobilizo okazas ĉefe pro sento ke la libera evoluo de la individuo estas pli kaj pli endanĝerigata de la establitaj ordosistemoj.

La establitajn ordosistemojn subtenas du tendencoj: unue malaktualaj kaj tro normigaj konceptoj pri la homo, due, la rapide evoluanta teknologio, kiu emas detrui kaj anonimigi la individuecon, detrui la fizikan ĉirkaŭaĵon de la homo, kaj subfosi la homan psikon.

La lingvo estas realaĵo intime ligita al sociaj kaj politikaj fenomenoj. Tial ĉiuj ajn aktivecoj pri lingvaj problemoj estas samtempe sociaj aktivecoj.

Se oni konsekvence aplikas la koncepton pri konservo de la integreco de la individuo, oni nepre venas al malaprobo de lingva kaj kultura diskriminacioj en ĉiu formo, al malaprobo de ĉiu tiel nomata solvo de la lingva problemo kiu baziĝas sur diskriminacio, kaj al konstato, ke oni ne sufiĉe atentas la detruadon de la kultura kaj lingva fono de multaj popoloj. Tiu detruado estas nenio alia ol instrumento de lingva imperiismo.

En nia propra laboro ni antaŭvidas esploradon kaj informadon pri la neadekvato de la monda lingva situacio, kaj pri ĝia kunligo kun la detruo de la homa personeco en la nomo de teknologia kaj ekonomia programo.

La mobilizo de la junularo estas subtenenda kaj partoprenenda batalo por la digno de la homo.

La estonta agado de TEJO inkluzivos lanĉon de aktivecoj kiuj celos plivastigi la dimension de la individuo en la socia kaj teknologia evoluo. Tiuj aktivecoj baziĝos sur la specialaj trajtoj de TEJO, kiel organizo laboranta por forigo de ĉia misuzo de lingvoj por ekonomia, kultura aŭ politika subpremado.

Ni alvokas ĉiujn homojn kaj junularajn organizojn al solidariĝo kaj laŭeble kunlaboro en tiu agado de TEJO.

La 25-a IJK fariĝis do mejloŝtono en la historio de TEJO, kiu profunde ŝanĝiĝis dum la tridek jaroj inter la Junulara Marŝo de Tervuren kaj la Deklaracio de Tyresö kaj kiu ankoraŭ en 1962 spertis ardajn diskutojn pri la demando, ĉu TEJO povas prezentiĝi en kongresoj de neneŭtralaj organizaĵoj. Nun, en 1969, TEJO-anoj iris

eĉ surstraten, farante protestan demonstracion kontraŭ lingva imperiismo en la magazena kvartalo de Stockholm. Post Tyresö, ankaŭ la NEJO-Komisiono eniris novan ŝtupon de sia agado, difinante sian celon ĉefe „protesto kontraŭ kultura kaj lingva superregado". Kaj el prava fiero pri sia prestiĝo, fontanta en multjara konscienca laboro, ĝi ĉerpis kuraĝon por proklami, ke TEJO ne intencas trudi Esperanton al reakciaj organizaĵoj. Dank' al ekspluato de ekstermovadaj monfontoj, la NEJO-Komisiono en 1969 unuafoje ne bezonis ŝarĝi la buĝeton de TEJO. En decembro 1970 la nova gvidantino de la Komisiono, Jeanne-Marie Liouville, faris kvarsemajnan rondvojaĝon tra 12 landoj de meza kaj sudokcidenta Eŭropo, vizitante dekduon da NEJOj, dekon da Esperanto-kluboj kaj TEJO-aktivulojn.

17.3.6 Interna Fortikiĝo

En 1969 la Reprezentanton de TEJO ĉe la Estraro de UEA anstataŭis plenrajta Estrarano pri junularaj aferoj. La rilatoj inter TEJO kaj UEA konstante pliboniĝis: Dum la Viena Kongreso la Komitato de UEA deklaris sin preta konsideri la ŝuldojn de TEJO al UEA senrentuma prunto de UEA, kaj fine de 1970 la CO en Rotterdam transprenis la kompostadon de *Kontakto*. La financan staton de TEJO iomete plibonigis la intensa varbkampanjo, el kiu rezultis kelkaj grandaj donacoj kaj kresko de la nombro de Patronaj Membroj (plenaĝaj subtenantoj) de 16 en 1969 al 52 en 1971.

La financa raporto pri 1970 montris unuafoje post multaj jaroj profiton — dank' al tio, ke la nombro de membroj kaj abonantoj preskaŭ duobliĝis dum tiu jaro. En 1971 la Komitatoj de UEA kaj TEJO rekomencis intensajn intertraktadojn pri firma integriĝo de TEJO en UEA.

Sekvante la spiriton de Tyresö, la Kongresoj de TEJO nun alprenis la karakteron de forumo, en kiu la partoprenantoj priparolas difinitan kongresan temon aparte aktualan: En Graz, en 1970, oni diskutis pri „Junularo kaj Lernejo — Ejo de la Revolucio", en Edinburgo (1971) pri „Junularo kaj Kulturo", kaj por Toruń oni fiksis la temon „Junularo kaj la Tria Mondo". Sarajevo (1973) estis dediĉita al „Junularo kaj Hommedio". Ekde 1969 la Universalaj Kongresoj inkluzivas Junularan Tagon. El aliaj junularaj renkontiĝoj estas aparte mencindaj la Kulturaj Festivaloj en Bulgario, la seminarioj en FR Germanio kaj Pollando, la tendaroj en Soveta Unio kaj la „kunloĝadoj" inter Japanoj kaj Koreanoj. En septembro 1971 la NEJO-Komisiono okazigis Seminarion pri Lingvo kaj Kulturo (prilumitaj el lingvistika, sociologia kaj ideologia vidpunktoj) en Strasburgo, kun la laborlingvoj Esperanto, angla kaj franca. En julio 1972 sekvis Seminario pri Lingvo kaj Politiko, en Parizo. Iniciato de TEJO-anoj estas ankaŭ la Someraj

17 TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

Universitataj Kursoj, kiuj unuafoje okazis en Lieĝo en somero 1972.

En Edinburgo aliĝis du novaj Landaj Sekcioj, de Germana Demokratia Respubliko kaj de Israelo, kaj unu regiona sekcio (en Tokio). En Toruń aldoniĝis dana kaj kolombia sekcioj, en Sarajevo la ĉilia. Sekve, TEJO havas nun 28 LS en ĉiuj mondopartoj kaj kunlaboras kun kvar sekcioj nealiĝintaj. STELO estas faka sekcio de TEJO, kaj kun la fervojista junularo ekzistas kontrakto pri kunlaboro. La nombro de komitatanoj kreskis de 23 en 1962 al 56 en 1972. Krom la jam menciitaj Komisionoj, laboras Sekretaria Komisiono, Komisiono pri Varbado kaj Komisionoj pri Regiona Agado, t.e. en Eŭropo, Latina Ameriko, Afriko, Azio-Oceanio kaj Mezoriento; tiuj lastaj celas helpi gejunulojn en regionoj sen organizita (junulara) movado.

En la tuta mondo aperas nuntempe deko da naciaj junularaj Esperanto-gazetoj. La organo de TEJO mem estas plue „TEJO-paĝo" en la revuo *Esperanto,* ĝis 1969 portinta la pionirepokan titolon *La Juna Vivo. Kontakto,* nun en la deka jaro de sia ekzisto, kiel porjunulara revuo en Esperanto, estante kuraĝigita de la Deklaracio de Tyresö, sendogme alfrontas la problemojn, kiuj decidas la pluan evoluon de tiu ĉi terglobo, sur kiu ni vivas. Por pli junaj legantoj nun ekzistas ankaŭ aparta revuo, *Juna Amiko,* kiu ekaperis en Hungario en novembro 1972.

La Estraro de TEJO estis ŝanĝita en Edinburgo. Anstataŭ Humphrey Tonkin, nun honora prezidanto, prezidis Renato Corsetti (Italio), kaj ĝenerala sekretario fariĝis, post Senad Čolić (Jugoslavio), la Hungarino Flóra Szabó-Felsö. La ceterajn taskojn dividis inter si naŭ estraranoj. En sia unua mesaĝo la nova prezidanto substrekis du gravajn taskojn de la estonteco: unue, grandskala aplikado de la principoj de Tyresö al la praktika poresperanta laboro, por ke la konvinko, ke disvastigo de Esperanto estas kontraŭimperiismo, atingu ankaŭ la neesperantistan junularon. Due, malcentriĝo de TEJO, t.e. forigo de la stranga stato, ke ĝis nun TEJO tro multe respegulis nur la ideojn de junaj Eŭropanoj: „Akiro de Afrika, Azia, Sudamerika ktp. 'vizaĝoj' estas por TEJO nepra historia neceso, kiun ĝi devas dum la venontaj jaroj kontentigi, se ĝi volas iun signifan rolon ludi."

Dum la IJK en Sarajevo (1973) ambaŭ gvidajn postenojn, tiun de prezidanto kaj tiun de ĝenerala sekretario, transprenis inoj — unuafoje en la 35-jara historio de TEJO: nome Flóra Szabó-Felsö resp. Renée Triolle. Laŭ klarigo de la nova prezidantino, TEJO devos rigore atenti, ke ĝi evitu la danĝeron de partipolitika flankeniĝo, kvankam tiu principo ne baras kunlaboron kun diverstendencaj organizaĵoj nek la liberan interŝanĝon de opinioj en la organoj de TEJO. Krom al la pliharmoniigo de la rilatoj kun UEA kaj la ekstereŭropa agado, TEJO

devos „pli forte dediĉi sin al la lerneja agado, ĉar se TEJO estas la estonteco de UEA, la lernejanoj estas la estonteco de TEJO".

17.4 ESENCA BIBLIOGRAFIO

v. d. Horst, M., *Tutmonda Junular-Organizo.* W.-Graftdijk 1948.

„1963, Jaro de la Junularo en la Esperanto-Movado". *Tamen,* vol. 4, 1962, n-ro 11/12.

Bakker, H., kaj W. F. Pilger, *Le problème linguistique dans les relations internationales de la jeunesse / The language problem in international youth relations.* Amsterdam 1967.

TEJO kaj vi. 1969. — Informa broŝuro.

Tonkin, Humphrey, „Fundamentoj de nia agado". *Kontakto,* vol. 7, 1970, n-ro 4, p. 3-4.

Corsetti, Renato, „Ekstereŭropigo — Tasko de TEJO". *Esperanto,* vol. 64, 1971, n-ro 12, p. 201.

TEJO, *Seminario „Lingvo kaj Kulturo", Strasburgo. Raporto.* Amsterdam 1971.

—, *Seminario „Lingvo kaj Politiko", Parizo. Raporto.* Amsterdam 1972.

ĈAPITRO 18

KONSTRUADO DE MODERNA UEA
(1948-1973)

18.1 ENKONDUKAJ RIMARKOJ

La Kontrakto de la 28a de aprilo 1947 inter la reprezentantoj de la antaŭaj Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Esperanto-Ligo, aprobita iom poste de la kompetentaj instancoj de ambaŭ organizaĵoj, kaj la akcepto de la Statuto de unueca UEA en aŭgusto 1948, finigis la duecon de la neŭtrala Esperanto-Movado kaj per tio forigis ĝenan obstaklon en la laboro por la Internacia Lingvo.

Ne temis nur pri la fortikigo de la neŭtrala monda Asocio el vidpunkto de la membro-nombro, kio per si mem ĉiam estas tre atentinda; nek sole pri ĉesigo de multjaraj kortumaj intervenoj kaj proceso, altruditaj de sensignifa, sed obstina malplimulto; ankaŭ ne pri la tradicia nomo de la organizaĵo, kiun la Komitato de IEL volonte akceptis dum la Universala Kongreso en Bern (1947). Ĉio-ĉi, kompreneble, ja estis salutinda, sed plej grava estis la liberigo de la disponeblaj fortoj por konstruado de fortika UEA konforme al la postulatoj de la postmilita mondo, kiel ankaŭ la pozitivaj psikologiaj efikoj de la fine akirita unueco je la praktikantoj de la lingvo kaj je la aktivuloj. La skismo de 1936, kiu devis ne okazi — kaj fakte ne estus okazinta, se la eta malplimulto estus observinta la vidpunkton de la grandega plimulto[1] — kaŭzis multe da personaj mal-

1. Vidu Ĉap. 14.3.5. La akcepto kaj lojala plenumo de la decidoj de la plimulto fare de la malplimulto — principo, kiu devus normale funkcii en demokrate organizita asocio — fakte fariĝis problemo en multaj kazoj, ĉar la malplimulto, kutime eĉ nur grupeto de kelkaj personoj,

agrablaĵoj al la demokrate elektitaj gvidantoj de la tiama UEA, poste IEL, precipe al la nobla prezidanto Generalo L. Bastien; forrabis valoran tempon; malhelpis la laboron en malfacilaj kondiĉoj. En 1948 almenaŭ tiu interna problemo estis fine likvidita per akcepto de la nova Statuto.

Per ĝi finiĝis la unua historia epoko de precize 40 jaroj en la vivo de UEA kaj ses jardekoj de la Internacia Lingvo. Komenciĝis la nova, aktuala periodo, kiu ankoraŭ ne fariĝis historio. Tial, diference de la kritikaj analizoj pri la historiaj okazintaĵoj kaj la ĉefaj protagonistoj, entenataj en la antaŭaj sekcioj, en tiu ĉi ĉapitro tiaj juĝoj estos ellasitaj. En iu posta periodo, kiam la nuna prezentiĝos kiel pasinteco, kompetenta historiisto havos abundan dokumentan materialon [2] kaj la bezonatan tempan distancon por kritike analizi la eventojn kaj personecojn en la Esperanto-Movado de la lastaj 25 jaroj. En la nuna momento estas pli utile limigi sin al prezento de esencaj faktoj kaj nur al plej koncizaj analizaj komentoj, necesaj por ekspliki la signifon de la faktoj, por reliefigi ilian kunligitecon kaj prilumi la evoluvojon, kiu kondukis de 1948 al 1973.

La Dua Mondmilito dezertigis vastajn surfacojn de la terglobo kaj rekte aŭ malrekte kaŭzis mizeron al la tuta homaro en ĉiuj sferoj, inkluzive la kulturan. Jam antaŭ la milito la Esperanto-Movado estis viktimo de persekutoj kaj malpermesoj [3]. La granda milito donis al ĝi plian fortan baton. En ĉiuj okupitaj regionoj ne nur praktike ĉesis kia ajn agado por la Internacia Lingvo, sed ankaŭ la havaĵo de Esperanto-organizaĵoj estis detruita aŭ konfiskita, se kuraĝaj unuopuloj ne sukcesis ion kaŝi kaj savi. Nekompareble pli grava estis la perdo de homaj vivoj. Inter la milionoj da pereintoj kaj mortigitoj troviĝis miloj da uzantoj de la Internacia Lingvo kaj multaj talentaj junaj aktivuloj. Rezulte, ekestis preskaŭ kompleta generacia vakuo, kies negativaj sekvoj parte sentiĝas ĝis la hodiaŭa tago; aliflanke la materiaj rimedoj de iam solidaj Esperanto-organizaĵoj estis reduktitaj al nulo.

La eksteraj cirkonstancoj estis malfacilaj dum la tuta pritraktata periodo. Kvankam la fondo de Unuiĝintaj Nacioj, Unesko kaj aliaj interŝtataj institucioj estis sendube pozitiva paŝo antaŭen, tamen en la realo ili perfidis la esperojn pri establo de daŭra paco kaj amikaj

klopodis per multe da bruo altrudi sian starpunkton. Tio elvokis superfluajn streĉitecojn kaj bremsis, eĉ kelkfoje provizore haltigis, la pozitivajn agadojn, sen kiuj progreso ne estas ebla.

2. Ĝi troviĝas ne nur en multaj artikoloj publikigitaj en Esperanto-periodaĵoj, sed precipe en la arkivo de CED kaj en la protokoloj de la Komitato, Estraro kaj aliaj konstantaj aŭ dumtempaj organoj de UEA.

3. Vidu precipe Ĉap. 21.

rilatoj inter la nacioj. Efektive, la kutima esprimo „postmilita periodo" rilatas nur al finiĝo de la Dua Mondmilito, sed ne al malapero de milito, ĉar dum tiu tuta tempo ne estis unusola tago de paco en la tuta mondo samtempe. Sur la aliaj kampoj de internaciaj rilatoj alternis blokoj kaj kontraŭblokoj; malvarma milito kaj kunekzistado; streĉitecoj sur la limoj de armitaj konfliktoj inter la grandpotencoj kaj provizoraj interkonsentoj; revolucioj, kontraŭrevolucioj kaj ribeloj, unuflanke, sufoko de rezistoj aŭ kreo de novaj ŝtatoj, aliflanke; konfliktantaj interesoj de evoluintaj kaj evoluantaj ŝtatoj; limigoj de internacia vartrafiko por protekti aŭ progresigi la propran nacian ekonomion kaj kreado de komunaj internaciaj merkatoj kun la sama celo; nestabileco de valutoj reflektiĝanta en deflacioj kaj inflacioj; novaj formoj de rasismo, kelkfoje eĉ fizikaj ekstermoj, kaj lukto kontraŭ ĝi; kultura imperiismo kondukanta al kultura genocido kaj nacia aŭ etna kontraŭstaro por konservi sian identecon. Ĉiuj-ĉi kaj multaj aliaj kontraŭaĵoj de la nuntempo, kiuj markas ĝin kiel epokon de escepte grandaj maltrankvilo kaj nervozeco, estas nenio alia ol manifestiĝoj de la fundamenta antagonismo inter la grandioza teknologia progreso, postulanta integriĝon en egaleco, kaj la kadukiĝintaj formoj de interne-ŝtata kaj internacia politikaj organizoj. La homaro estas disŝirata inter la 21-a kaj 19-a jarcentoj: la progresintaj materiaj fortoj trenas ĝin en la 21-an, sed la postrestintaj sociaj-politikaj konceptoj kaj juraj preskriboj katenas ĝin al la 19-a. Tutcerte ĝi fine eniros la 21-an tempe kaj, poste, ankaŭ strukture, sed en la postmilita periodo ĝi baraktis — kaj verŝajne plu baraktos dum ankoraŭ sufiĉe longa tempo — en la kaptiloj de la reto, kiun necese plektas la evoluo, kaj el kiuj, same necese, ĝi fine ĉiam sukcesas liberigi sin kaj krei novan socion, konforman al la postulatoj de la evoluintaj materiaj fortoj.

Agado por afero internacia — tute speciale por Esperanto kiel lingva esprimo de la plej pura humanisma internaciismo — en kondiĉoj de tiaj tensioj kaj ĉiaspecaj baroj al internacia komunikado, postulas daŭran solvadon de malfacilaj problemoj kaj venkadon de obstakloj.

Al tiuj eksteraj malfacilaĵoj aldoniĝis la internaj: parte jam tradiciaj, ĉar ili bedaŭrinde akompanas la Esperanto-Movadon ekde ĝia naskiĝo; parte novaj kaj antaŭe ne spertitaj. Ne temas, certe, pri sanaj diskutoj kaj utilaj konfrontiĝoj de malsamaj opinioj pri gravaj demandoj kun la celo trovi adekvatajn solvojn. Tio ĉiam donis kaj plu donos bonajn rezultojn. Ankaŭ ne temas pri misagoj, bazitaj sur eraraj juĝoj pro manko de scioj, aŭ pro ignorado de faktoj, aŭ pro la malkapablo korekte taksi ilin, aŭ pro la kombino de la tri. Tio, kvankam malutila kaj tial evitinda, estas almenaŭ

komprenebla. La vere gravajn internajn malfacilaĵojn kaŭzis konsciaj misprezentoj pri faktoj, agadoj aŭ personoj; deformado de la realo per sistemaj prisilentoj de objektivaj atingoj kun paralela laŭdado de sensignifaj okazaĵoj aŭ de rektaj fuŝaĵoj; en la lasta tempo eĉ aperta dissemado de defetismo. Kontraŭ tiaj negativaj fenomenoj necesis reagi de tempo al tempo ne tiom pro la vero kiel valoro per si mem — kvankam, kompreneble, la vero ĉiam indas lukton kaj oferojn — kiom por forigi danĝerajn kaj senkuraĝigajn falsajn imagojn, malebligi pli grandan malbonon kaj reestabli la ekvilibron. Sed tio, siavice, necese deturnis la atenton for de la aktualaj taskoj, kaŭzis preterpason de unikaj ŝancoj [4], kaj perdigis multe da plia tempo kaj energioj, kiuj povis esti utiligitaj por pozitiva laboro. La situacion difinis la aŭtoro de tiuj ĉi linioj per unusola frazo en unu el la diskutoj dum la Londona Universala Kongreso (1971): „Malfacile estas lukti per sia nuda brusto kontraŭ potenca malamiko, kaj samtempe daŭre eligadi tranĉilojn el sia dorso kaj vindadi la vundojn". Kvankam aplikeblaj al personoj, en tiu ĉi kunteksto la vortoj ĉefe rilatas al la Esperanto-Movado kiel tia.

Nu, tiaj malsanoj atakas en pli aŭ malpli alta grado ĉiujn batalantajn sociajn-kulturajn movadojn, precipe en ilia infanaĝo. Feliĉe, la vastaj tavoloj de la Esperanto-Movado jam montriĝis sufiĉe maturaj por distingi objektivajn valorojn disde blufoj, pozitivismon disde defetismo, kvankam kutime la ĝusta orientiĝo postulis iom tro da tempo. Ju pli la Esperanto-Movado evoluas, des pli rapide ĝi reagos, kaj des pli efike ĝi aŭtomate eliminos el sia organismo la kaŭzantojn de infanaĝaj malsanoj aŭ eĉ infektoj. Dume, ili tamen ekzistis ankaŭ en la postmilita periodo kaj prezentis la ĉefan internan malhelpon.

La ĉesigo de la dueco, esprimita en la aktoj de 1947-48, kvankam sendube tre pozitiva fakto, neniel per si mem signifis kreon de unueco, ankoraŭ malpli aŭtomatan solvon de multnombraj problemoj, kiujn kaŭzis la skizitaj eksteraj kondiĉoj kaj interna situacio. Dum ĉiuj kontentis kaj multaj jubilis pro la ĉesigo de la dueco, klarvidaj

4. Ekzemple en la periodo 1954-1956, kiam la senprecedenca kampanjo de kalumnioj kaj falsaj politikaj denuncoj de G. A. Connor (kaj grupeto da personoj ĉirkaŭ li) en Usono kaj ĉie tra la mondo, kun ĉiuj kunligitaj negativaj sekvoj, kaŭzis, ke la Esperanto-Movado ne sukcesis plene ekspluati la escepte favorajn cirkonstancojn, ekestintajn post la Rezolucio de Unesko de 1954 (v. Ĉap. 22). G. A. Connor estis eksigita el UEA per preskaŭ unuanima decido de la Komitato en 1956, sed intertempe la malbono estis farita kaj du jaroj preskaŭ komplete perditaj.

personoj bone komprenis jam tiam, ke necesos multflankaj sciencaj esploroj kaj teoriaj studoj, abundaj spertoj akireblaj nur per intensa praktika laboro, kaj grade vastiĝantaj diversdirektaj agadoj — ĉio ĉi taŭge kombinita en unu granda tuto — por fortikigi la Asocion interne surbaze de unueca platformo; por transformi iom post iom la Esperanto-Movadon en atentindan kulturan kaj socian faktoron de la nuntempo; por doni al la Internacia Lingvo la meritatan prestiĝon kaj tiel faciligi ĝian pluan disvastiĝon. Konkrete, sukcesa laboro postulis: (i) teorian prilaboron kaj praktikan aplikon de kelkaj esence gravaj bazaj konceptoj; (ii) solvadon de organizaj demandoj konforme al la bezonoj de unuopaj evoluperiodoj; (iii) adaptadon de la organiza strukturo de UEA al la celoj, taskoj kaj konsisto de la Asocio; (iv) paralelajn agadojn en la tri ĉefaj branĉoj — informado, instruado, praktikaj aplikoj — post realecaj taksoj de la faktaj eblecoj; (v) samtempajn klopodojn finance fortikigi la Asocion.

Grandiozaj estis la taskoj, kiujn en 1948 kaj poste frontis UEA kaj ĝiaj organoj aŭ unuopaj funkciuloj, al kiuj la membraro konfidis la gvidadon de la Asocio [5].

5. La lasta Komitato de IEL havis entute 21 membrojn. La lasta Estraro de IEL, elektita en 1938, konsistis el 5 personoj: Generalo L. Bastien, prezidanto; E. Malmgren, vicprezidanto; D-ro P. Kempeneers, D-ro I. Lapenna kaj A. C. Oliver, membroj. Okaze de la kunfandiĝo la du estintaj prezidantoj de IEL kaj UEA estis elektitaj dumvivaj Honoraj Prezidantoj de UEA: Generalo L. Bastien (1947-1961) kaj Hans Kürsteiner (1947-1968). Laŭ la interkonsento de aprilo 1947, dum la UK en Bern estis formita nova Estraro de 8 personoj: E. Malmgren (Svedio), prezidanto; D-ro P. Kempeneers (Belgio), vicprezidanto; H. Jakob (Svislando), D. Kennedy (Britio), D-ro I. Lapenna (Jugoslavio), A. C. Oliver (Britio) kaj P. Petit (Francio), membroj. Ĝi estis la unua Estraro, kiu funkciis ĝis la akcepto de la nova Statuto en 1948. Konforme al la nova Statuto, en 1949 la Estraro konsistis nur el 5 personoj. Dum la UK en Bournemouth (1949) por la unua fojo estis dividitaj la ĉefaj taskoj inter la unuopaj estraranoj jene: E. Malmgren, prezidanto (ĝeneralaj aferoj kaj rilatoj kun la landaj asocioj); d-ro P. Kempeneers, vicprezidanto (kulturaj aferoj kaj fakaj asocioj); H. Jakob (publikaĵoj, biblioteko kaj servoj); Prof. D-ro Ivo Lapenna (ĝenerala propagando, kongresoj, juraj demandoj); A. C. Oliver (financoj, administrado, propagando de UEA). Kiel ĝenerala sekretario — tiama titolo por la administranto de la Centra Oficejo — plu funkciis C. C. Goldsmith. La sama Estraro estis elektita de la Komitato dum la pariza UK (1950), sed laŭ propono de la Estraro, en printempo 1951, la Komitato elektis D. Kennedy kiel plian estraranon, kiu transprenis de D-ro P. Kempeneers la branĉon fakaj asocioj. En la postaj jaroj okazis pliaj ŝanĝoj.

18.2 BAZAJ KONCEPTOJ

18.2.1 Universaleco kaj Neŭtraleco

La du konceptoj, interdependaj en tiu ĉi kunteksto, havas du malsamajn sencojn, kiuj siavice estas firme reciproke kunligitaj.

Ambaŭ estas aplikataj kaj al la Internacia Lingvo mem kaj al la organizita agado por ĝia progresigo. Pro la unuaranga graveco de tiu fundamenta demando pri universaleco kaj neŭtraleco, pri iliaj interdependeco kaj kunligiteco, la Estraro de la nova UEA dediĉis al ĝi ekde la komenco la plej grandan atenton. Jam la unua inaŭgura kongresa parolado post la kunfandiĝo, kaj entute en la postmilita periodo (Parizo, 1950), pritraktis la aferon el ambaŭ vidpunktoj kaj formulis la ĉefajn ideojn rilate la situacion de la Internacia Lingvo en la aktualaj kondiĉoj kaj la pozicion de UEA, determinitan de tiuj kondiĉoj. De tempo al tempo necesis denove prilumi la aferon en artikoloj kaj diskutoj, el kiuj la debato dum la UK en Londono (1971) estas aparte menciinda.

18.2.1.1 *Apliko al la Lingvo.* — La esprimo „universala", se aplikita al la lingvo mem, havas almenaŭ du signifojn.

La unua kaj plej profunda fontas el la fakto, ke la Internacia Lingvo — internacia en la vera senco de la vorto pro siaj interna strukturo, socia portanto kaj celo — formiĝis en ĝusta historia momento kaj nun ruliĝas sur tiu vasta kaj longa evoluvojo, kiu elbestigis la homon kaj ekde tiam kondukas la homaron de la iama disrompiteco en formo de hordoj, gentoj, triboj — tra ĉiam pli vastaj sociaj grupiĝoj, tra la nunaj nacioj-ŝtatoj kaj diversspecaj internaciaj kaj interŝtataj kuniĝoj — al estonta tuthoma, universala socio. La vojo, kompreneble, ne estas glata, nek rekta, sed plena de obstakloj kaj zigzagoj. Tial ankaŭ la progresado, tutcerte, ne ĉiam estas egale rapida: nek senhalta, nek sensalta, eĉ ne sen provizoraj regresoj. Du paŝojn antaŭen ofte sekvas retropaŝo aŭ, kelkfoje, eĉ pli da ili. Malatenta observanto kun mallarĝaj perspektivoj, limigitaj sole al malfeliĉe elektita tempofrakcio de stagno aŭ devojiĝo, eĉ povas facile konkludi, ke tiurilate ekzistas pli da regreso ol da progreso. Tamen, en grandaj linioj, tra la longa historio ekde la homiĝo, la evoluo de la materiaj fortoj kaj de iliaj ideologiaj manifestiĝoj ja altrudis la kreon de ĉiam pli vastaj sociaj komunaĵoj kun propraj komunaj lingvoj, kaj tiu integriĝa procezo renkonte al universaleco ne povas esti haltigita.

En tiu ĉi lasta stadio de la integriĝa procezo la Internacia Lingvo okupas sian ĝustan pozicion kaj plenumas ĉiam pli sian fekundan funkcion.

18 KONSTRUADO DE MODERNA UEA (1948-1973)

La ideo mem pri internacia lingvo estas esprimo de universalecaj tendencoj. La realigo de la ideo en la formo de Esperanto estas unu el la plej videblaj konkretaj manifestiĝoj de la celado al tuthomeco. Sed samtempe ĝi estas ankaŭ potenca antaŭeniganto de tiu sama universalismo, kiu ĝin kreis.

Ĉiu ajn lingvo troviĝas en funkcia rilato kun la bazo, el kiu ĝi elkreskis. La lingvo ebligas ne nur la pensadon kaj la reciprokan komunikadon, sed ĝi ankaŭ kreas kaj flegas difinitan senton de komuneco inter la personoj, kiuj ĝin uzas. Naskita de difinita socio, ĝi mem cementas la socion kaj ŝirmas ĝin kontraŭ disfalo. Tial ankaŭ la Internacia Lingvo ne estas, nek povas esti, sole teknika rimedo de pensado, nek nura instrumento de komunikado en internaciaj kadroj. Ĝi havas ankaŭ profundan idean signifon. Same kiel la naciaj normaj lingvoj — kaj adekvate kiu ajn lingvo en rilato al sia respektiva socia portanto — ludis kaj ludas unu el la ĉefaj roloj en la formiĝo kaj konserviĝo de la nacioj, tiel same la Internacia Lingvo estas decida faktoro en la kreado kaj stimulado de tuthoma, universala solidareco.

Per tio finiĝas la identeco kaj komenciĝas la granda diferenco ĝuste pro la malsameco de la socia portanto. Dum la naciaj lingvoj, en pozitiva senco, ebligas komunikadon interne de la koncerna lingva komunaĵo, samtempe ili, en negativa senco, izolas ĝin disde la aliaj. La socia-komunika funkcio de la Internacia Lingvo estas tuthoma, sekve senigita de la negativa aspekto. Plue, dum la naciaj lingvoj pozitive kontribuas al la interna kohereco de la koncernaj komunaĵoj en diversaj gradoj (ekde milda patriotismo ĝis ekstremaj ŝovinismo aŭ eĉ naziismo), pro tiu fakto mem ili samtempe manifestas negativan efikon, nome fremdigas la naciojn unujn de la aliaj, kio siavice faciligas reciprokajn suspektadojn, tensiojn, konfliktojn kaj militojn. Ankaŭ sur tiu grava kampo de la ideologia sfero la Internacia Lingvo, pro sia tuthomara solidariga rolo, manifestas nur la pozitivan flankon. Tio, kompreneble, neniel signifas, ke la Internacia Lingvo povus per si mem, kvazaŭ mirakle, solvi ĉiujn sociajn kaj personajn problemojn, kontraŭdirojn, antagonismojn kaj streĉitecojn, kiel kelkaj naivuloj emas kredi, bonintencaj ignorantoj riproĉi kaj malicaj kontraŭuloj imputi. Ĝi signifas precize kaj sole tion, kio estas koncize analizita kaj kio povas esti resumita en ununura frazo: foje unuiĝinta, la estonta tuthoma socio evidente ne povos starigi sin kontraŭ samkarakteran socion, ĉar tia tutsimple ne ekzistos; sed ĝi ja povos kaj devos mobilizi ĉiujn fortojn por kontraŭbatali mizeron kaj seriozajn danĝerojn minacantajn eĉ la vivon mem sur nia terglobo, utiligi la akumulitajn sciojn por plia subigo de la naturo kaj por ekspluatado de ĝiaj senfinaj riĉaĵoj en la intereso de ĉiuj.

Tio estas la senco de universaleco. Kaj tia plena universaleco ne estas atingebla sen komuna, tuthoma lingvo kiel unu el ĝiaj ĉefaj elementoj, fakte integra parto.

Esence, Zamenhof pravis ankaŭ rilate la solidarigan rolon de la Internacia Lingvo en la procezo de integriĝo survoje al universaleco, kvankam, eble, la termino „interna ideo" ne estis tre feliĉe elektita, ĉar iom tro mistika kaj tial science neadekvata. Verŝajne tio kaŭzis, ke la koncepto, kiun la termino celis indiki, estis ofte nekomprenata, miskomprenata aŭ eĉ misuzata, sed tio neniel senigas nek povas senigi la koncepton mem de ĝia scienca valoro.

Al tiu ĉi unua signifo de „universala-universaleco" respondas la samranga „neŭtrala-neŭtraleco".

La lingvo mem, ĝuste pro sia karaktero, prezentiĝas kiel tuthomara supernacia komunikilo, do neŭtrala en rilato al kiu ajn lingvo nacia, etna aŭ alispeca. Tamen, tio neniel implicas reciprokecon, nome same neŭtralan sintenon al Esperanto fare de ĉiuj nacioj kiel spiritaj proprietuloj de la naciaj lingvoj, resp. de iliaj politikaj gvidantoj. Ĉiuj ekstremaj naciismoj, kiuj regule generas despotecajn kaj tiranecajn reĝimojn kun imperialismaj tendencoj, levis sin kontraŭ Esperanton, malpermesis la lingvon, persekutis la lingvouzantojn. Ofte tio okazadis sub preteksto de „misuzo" de la lingvo por revoluciaj, kontraŭrevoluciaj aŭ ĝenerale subversaj [6] celoj — depende de la karaktero de la reĝimo. Certe, la Internacia Lingvo estis kaj verŝajne plu estos uzata ankaŭ por tiaj celoj. La naciaj lingvoj, inkluzive la propran, estas same tiel utiligataj por identaj celoj, eĉ multe pli ol Esperanto, sed tamen oni neniam aŭdis, nek iam povos aŭdi, ke pro tia „misuzo" kiu ajn nacia lingvo kiel tia estus kiam ajn malpermesita. La vera kaŭzo de persekutoj ne estas „misuzo" aŭ „neneŭtraleco", sed ĝuste tiu ĉi aspekto de lingva neŭtraleco kiel korelativo de universaleco.

Ne temas, do, pri iaj revoluciaj aŭ subversaj politikaj agadoj de unuopuloj aŭ grupoj per Esperanto, sed pri tute alispeca revolucio: la revoluciaj ŝanĝiĝoj en la pensmaniero kaj sentado, nome la transformiĝado de mallarĝe naciisma konceptado al universale homa, kiun kreas aŭ stimulas kaj flegas la Internacia Lingvo. Kaj tio estas negacio de ekstrema naciismo, kiun ĝi tial necese, pro la naturo mem de la afero, devas reziste kontraŭbatali eĉ per la plej drastaj metodoj ĝis, fine, ĝi mem estos neniigita. Cetere, la sufokado de Esperanto estas nur unu el la multaj reagoj de reakciaj fortoj kon-

6. *Subversa:* celanta subfosi, renversi, detrui ekzistantajn institucionjn, establitajn kredojn, aŭ grave malfortigi lojalecojn; en politika senco kutime kontraŭleĝa, sekreta, celanta renversi la establitan politikan sistemon.

traŭ ĉiujn fortojn de la nehaltigebla progreso, kaj tiu ago-reago estas entenata en la leĝeco mem de la evoluo. Samtempe ĝi estas plia konfirmo en la praktiko de la teoria ekspliko pri la idea signifo de la lingvo.

La nuntempaj kulturaj kaj lingvaj imperialismoj, ligitaj al ekonomia ekspansiemo de la grandaj potencoj kaj de kelkaj mezgrandaj ŝtatoj, eĉ de tiuj kun demokrataj politikaj institucioj, ofte prenas similan negativan pozicion al Esperanto pro esence samaj kaŭzoj, kies radikoj troviĝas en la neŭtrale homa karaktero de la lingvo, kvankam ili ne aplikas ekstremajn metodojn de perforto por malebligi ĝian disvastigon. Aliflanke, la Internacia Lingvo pro sia tuta karaktero fortikigas la universalecajn tendencojn kaj certe akiros ĉiam pli firmajn poziciojn kiel lingvo de humanisma internaciismo.

En la dua senco, logike derivita de la unua, la universaleco de la Internacia Lingvo signifas ĝian ĝeneralecon. Esperanto ne estas limigita al iu aparta klaso aŭ alia socia tavolo, nek ĝi servas por komunikado nur en unu sfero de la internacia vivo — ekzemple ekskluzive en la scienco aŭ komerco aŭ belartoj aŭ turismo — sed ĝi estas proprieto de la tuta homaro kaj de ĉiuj personoj kiuj ellernas ĝin kaj utiligas por ĉiuj siaj bezonoj. Siavice, la neŭtraleco de la lingvo egalas al ĝia apliko por kiu ajn celo: de ĉiutaga konversacio ĝis la uzo por sciencaj, kulturaj, politikaj celoj aŭ kiu ajn alia praktika bezono. En tiu ĉi senco ĝi prezentiĝas kiel nura instrumento, kaj instrumento evidente restas „neŭtrala" tute egale en kies manoj ĝi troviĝas kaj por kiuj celoj ĝi estas uzata. Tio estas tiel simpla kaj klara, ke efektive ne necesus ĝin eĉ mencii, se ne troviĝus personoj, kiuj obseditaj de siaj antaŭjuĝoj, faras eĉ tiajn groteskajn riproĉojn, ke Esperanto „ne estas neŭtrala", ĉar en ĝi estis publikigita tiu aŭ alia verko nekonforma al la gusto de la riproĉinto.

18.2.1.2 *Apliko al Universala Esperanto-Asocio.* — Kiel indikas ĝia nomo, UEA estas „universala". Nuntempe eĉ pli, ol ĝi estis en 1908 kaj en la unua periodo post la fondiĝo.

Laŭ la unua Statuto de 1908 la celo de la Asocio estis plifaciligi ĉiaspecajn rilatojn inter diverslingvanoj kaj krei „fortikan ligilon de solidareco inter la membroj". La membroj estis nur individuaj personoj, ne organizaĵoj.

Reflektante la evoluintan koncepton pri la universaleco de la lingvo, la universaleco de la nuntempa UEA estas multe pli vasta. Laŭ la nun valida Statuto, laste reviziita en decembro 1956, unu el la celoj de UEA estas „plifaciligi ĉiaspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo" (Art. 3). La nuna Statuto ja enhavas preskaŭ la saman regulon rilate la solidarecon inter la membroj, kiel tiu de 1908, sed

ĝi ankaŭ aldonas: „....kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj". Tio transpasas la limojn de nur interna solidareco inter la membroj kaj transiras en la sferon de konscia utiligado de la lingvo por internacia kompreniĝo konforme al la solidariga rolo de la lingvo. Tuta aro da agadoj de UEA en la lastaj 25 jaroj celis, interalie, realigi ĝuste tiun taskon. Ĉi tie estu menciitaj nur kelkaj: internaciaj prelegvojaĝoj kun temoj rilatantaj al diversaj landoj kaj popoloj, specialaj seminarioj dediĉitaj al tiu temo, multaj el la prelegoj en Internacia Somera Universitato (ISU), belartaj konkursoj kaj artaj festivaloj, kulturaj aranĝoj dediĉitaj al la kongresaj landoj, publikigo de valoraj tradukaj verkoj, la tuta serio Oriento-Okcidento, multnombraj artikoloj en la periodaĵoj de la Asocio rekte celantaj disvastigon de konoj pri diversaj popoloj kaj evoluigon de respekto por iliaj kulturo kaj formoj de civilizo, ktp.

Plue, dum la malnova UEA organizis „diversajn praktikajn servojn por la membroj" pere de la delegita reto, la moderna UEA ja daŭrigis la plenumadon de la sama funkcio, sed prenis sur sin ankaŭ la taskon „krei internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj", kies intelektaj aŭ materiaj interesoj transpasas la limojn de ilia nacia, etna aŭ lingva teritorio (Art. 3). Ankaŭ tiun funkcion UEA plenumas diversmaniere ĉu rekte, ĉu pere de la grandiĝanta delegita reto.

Fine, la nuna UEA estas pli universala ol la originala ankaŭ el vidpunkto de la membraro. Diference de la antaŭa, kiu havis nur individuajn membrojn, la moderna UEA konsistas el landaj Esperanto-asocioj, fakaj organizaĵoj kaj individuaj membroj. Al UEA povas aliĝi ĉiu „honorinda persono" laŭ diversaj kategorioj (Art. 10-12). Krome, al UEA povas aliĝi ĉiu ajn landa Esperanto-organizaĵo, se ĝi estas laŭorde organizita kaj se vidiĝas klare el ĝia statuto, ke temas pri asocio neŭtrala en la senco de Art. 4. Al UEA povas aliĝi ankaŭ internaciaj neŭtralaj fakaj Esperanto-organizaĵoj, aŭ, se ili tion preferas, tiaj organizaĵoj povas fari kontrakton kun UEA pri komuna agado, interŝanĝo de servoj, ktp. Aliflanke, la Asocio rajtas fari kontrakton pri kunlaboro kaj interŝanĝo de servoj kun internaciaj *ne*neŭtralaj Esperanto-asocioj, kondiĉe ke tiuj rilatoj ne kontraŭu la principon entenatan en Art. 4. Ekzistas eblecoj por kontraktaj rilatoj eĉ kun landaj fakaj asocioj kaj por aliĝo de unuopuloj aŭ organizaĵoj, kiuj simpatias kun la celoj de la Esperanto-Movado eĉ se ili ne uzas Esperanton, en la kategorio de apogantoj kaj apogantaj asocioj.

Efektive, tia konceptado de universaleco, ankaŭ en tiu ĉi rilato konforma al la universaleco de la lingvo, ebligis transformiĝon de UEA en multe pli universalan organizaĵon ne nur laŭnome, sed ankaŭ laŭ la teritoria etendiĝo kaj konsisto. Interalie, tio vidiĝas el jenaj faktoj:

18 KONSTRUADO DE MODERNA UEA (1948-1973)

En 1948 UEA konsistis el 19 landaj asocioj (LA), neniu aliĝinta faka asocio (FA), 7 FA en kontraktaj rilatoj, 17.707 membroj en 70 landoj kaj 2.224 delegitoj en 58 landoj. En 1971 UEA konsistis el 34 LA, 3 aliĝintaj FA, 23 kunlaborantaj FA kaj neneŭtralaj Esperanto-organizaĵoj, 32.070 membroj en 88 landoj, 3.501 delegitoj en 66 landoj. Interalie, tiu nombra kresko kaj teritoria vastiĝo pligrandigis kaj pliprofundigis la valoron de la principoj rilatantaj al la praktikaj servoj por la membraro, internaciaj servoj uzeblaj de ĉiuj homoj kaj solidariga rolo de la lingvo interne de la Asocio kaj ekster ĝi.

Mallonge, la universaleco de la nuna UEA el ĉiuj vidpunktoj — celoj, agadoj kaj konsisto — maksimume respondas al la universaleco de la lingvo en ambaŭ ĝiaj ĉefaj signifoj, kiel prezentite en la antaŭa sekcio.

La neŭtraleco de UEA estis jene formulita okaze de ĝia fondiĝo en 1908: „UEA estas neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco." Post la interkonsento de Kolonjo de la 4-a de aŭgusto 1933 [7], la principo estis reformulita en nova Art. 4 de la Statuto: „UEA estas neŭtrala rilate al religio, nacieco, politiko *kaj sociaj demandoj;* en ĝi viroj kaj virinoj estas egalrajtaj kaj elekteblaj al ĉiuj oficoj". Identan formulon enhavis Art. 4 de la Statuto de Internacia Esperanto-Ligo (IEL) de 1936, reviziita en julio 1940. Ĝi restis senŝanĝa ĝis 1947, resp. ĝis 1948 en la Statuto de la Asocio.

La aldono pri egalrajteco de viroj kaj virinoj fakte havis nenian signifon, ĉar ankaŭ pli frue tiu principo estis rekonita kaj ĉiam respektata. Eble ĝi estis intence metita en la Statuton por iel kaŝi aŭ ekvilibrigi la multe pli signifan aldonon pri neŭtraleco rilate sociajn demandojn. Tio okazis en Kolonjo, en la tempo de jubilanta ekstreme reakcia naciismo, kiam multaj el la tiamaj gvidantoj de la neŭtrala Esperanto-Movado abomenis eĉ la vortradikon *soci-* pro timo, ke en la publika imago kaj ankoraŭ pli en la sekretaj policaj dosieroj ĝi iel povus esti ligita al socialismo kaj similaj „subversaj" [8] movadoj. Necesis, do, klare kaj eksplicite distanciĝi por „savi la aferon", kvankam — tute kompreneble por ĉiuj, kiuj komprenas la idean rolon de la lingvo — tio neniel influis la naziajn kaj similajn tiranecajn reĝimojn [9]. Nur la senespera deziro eviti malagrablaĵojn por la Movado kaj por si mem povas ekspliki tiun absolute maltaŭgan aldonon. Ĉiu lingvo inkluzive Esperanton ja estas socia fenomeno, kaj la tuta Esperanto-Movado sendube estas socia-kultura laŭ sia objektiva karaktero, kiun neniaj humiligaj kaj pseŭdosciencaj

7. V. ankaŭ Ĉap. 14.3.4.
8. V. piednoton 6 en tiu ĉi ĉapitro.
9. V. Ĉap. 21.

asertoj povas ŝanĝi. Nur pretervido kaŭzis, ke en 1947, kiam en Bern la Komitato reformulis la principon en atmosfero de sufiĉe granda streĉiteco, tiu ereto restis en la Statuto. En ĉiu okazo la vortoj „rilate al politiko" ja abunde kovras la neŭtralecon koncerne kian ajn apartan partipolitikon, ĉu socialisman, ĉu nesocialisman.

Dum la UK en Bern la principo de neŭtraleco estis precizigita. Al Art. 4 estis aldonita nova alineo, kiu tekstas:

> UEA deklaras, ke la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo. Ĝia sinteno estas diktata de la ideaj celoj de la Esperanto-Movado. Ĝi rilatas simpatie al ĉiuj movadoj, kiuj sur nepolitika bazo klopodas efektivigi ideojn identajn tute aŭ parte kun la celoj de la Asocio.

Tiu grava aldono korektas kaj limigas la absolutan neŭtralecon, eĉ politikan, formulitan en la unua alineo. La nova formulo estis akceptita meze de 1947, do proksimume unu jaron kaj duonon antaŭ la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, proklamita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj la 10-an de decembro 1948. La Universala Deklaracio proklamas nombron da rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, egale validaj „por ĉiuj homoj sen kia ajn diferencigo, laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato". La Universala Deklaracio aparte rekonas nombron da kulturaj kaj lingvaj rajtoj, kaj la fundamentajn politikajn liberecojn. Evidente, post la proklamo de la Universala Deklaracio, la formulo en la dua alineo de Art. 4 de la Statuto de UEA ricevis eĉ pli konkretan enhavon kaj pli grandan valoron. Principe, la neŭtraleco de UEA ĉesas tie, kie komenciĝas la malobservo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, kiel formulitaj en la Universala Deklaracio. Tio per si mem senigas de kia ajn senco la hazarde postrestintan neŭtralecon rilate „sociajn demandojn".

Aliflanke, la neŭtraleco de UEA necese ĉesas tie, kie komenciĝas atakoj kontraŭ Esperanto en kiu ajn formo, eĉ ekster la malobservado de la Universala Deklaracio.

Du jarojn post la amendo de Art. 4 de la Statuto, en la menciita inaŭgura parolado dum la Universala Kongreso de Esperanto en Parizo (1950), estis, interalie, dirite:

> UEA estas neŭtrala. Ĝi troviĝas ekster kaj super la politikaj luktoj, sed en ĝiaj fundamentoj troviĝas la principo de la respekto al homaj rajtoj kaj liberecoj. Tio signifas, ke ĝi — celante disvastigi la Internacian Lingvon kune kun ĝia nedisigebla apartenaĵo: la spirita proksimiĝo de la homoj — ebligas al ĉiuj siaj membroj konservi siajn proprajn mondrigardojn kaj konvinkojn, libere esprimi siajn opiniojn.

> La neŭtraleco ne signifas, do, senideecon aŭ uniformigon de la penso. Male, ĝi estas konvena grundo por kresko kaj florado interne de la Movado de ĉiaspecaj pensoj kaj ideoj — krom tiuj, kiuj evidente kontraŭas al la esenco mem de la Internacia Lingvo kaj de ĝia signifo.... La neŭtraleco, plue, signifas, ke en eksteraj rilatoj ni ligas nin al neniu politika koncepto, al neniu alia movado, al neniu fremda ideologio. Kiel esperantistoj ni estas memstaraj kaj sendependaj, kaj ni iras nian propran vojon. Tio, kompreneble, ne signifas, ke ni estas indiferentaj rilate al la okazaĵoj en la mondo.....

Tia koncepto de neŭtraleco, oni povus ĝin nomi aktiva neŭtraleco, estas io tute alia ol la senkuraĝa, pasiva neŭtraleco, praktikata tiel ofte en la pasinteco.

En sia multflanka laboro por Esperanto UEA aplikis en la praktiko la principon de aktiva neŭtraleco dum la lastaj 25 jaroj. Interne de la Asocio necesis plurfoje kontraŭbatali ekstreme dekstrajn aŭ ekstreme maldekstrajn premojn. En sia agado en la ekstera mondo la Asocio insiste kaj sisteme apogis ĉiujn tendencojn kaj fluojn, kiuj fortikigas la observadon de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, la plibonigon de la rilatoj inter la popoloj kaj nacioj. Al tiuj agadoj apartenas, ekzemple, la grandaj kampanjoj de UEA okaze de la Jaro de Homaj Rajtoj aŭ la Jaro de Internacia Kunlaboro. Samtempe UEA reagis energie en kazoj de atakoj kontraŭ Esperanto tute egale de kiu flanko ili venis. Ĝi aligis siajn fortojn al la klopodoj de UN, Unesko kaj aliaj organizaĵoj en la lukto kontraŭ rasismon kaj rasan diskriminacion. Sed UEA aldonis tute apartan kontribuon per sia batalo kontraŭ la lingvan kaj ĝenerale kulturan diskriminacion, kontraŭ kulturan genocidon aŭ memmortigon. Ĝi estis la unua, kiu atentigis pri tiu formo de diskriminacio jam en 1965 okaze de la malkovro de la Zamenhof-monumento en Linz, Aŭstrio. Dum la tuta Jaro de Internacia Kunlaboro (1965) kaj poste la demando estis esplorata kaj prilumata el ĉiuj flankoj, tiel ke baldaŭ progresemaj fortoj ankaŭ ekster la Esperanto-Movado komencis studi ĝin kaj uzi la terminon kultura kaj lingva diskriminacio.

Interne de la Asocio la principo estis aplikata prudente elaste. Tiun elastecon diktis la fakto, ke la aliĝintaj asocioj de UEA troviĝas en landoj kun tre malsamaj politikaj reĝimoj kaj tial ankaŭ kun malsamaj konceptoj pri politika neŭtraleco. Io, kio estas rigardata kiel tute normale neŭtrala en unu politika medio, povas esti konsiderata kiel politike neneŭtrala en alia medio. Rigore observante la reformulitan, vastan principon de neŭtraleco por UEA kiel tia, oni devis kompreneme rilati al kelkfojaj devojiĝoj en unuopaj landoj, se tiuj devojiĝoj ne afekciis iel serioze la neŭtralecon de UEA kiel reprezentanto de la neŭtrala Esperanto-Movado en la mondo.

Tiel komprenata kaj praktikata neŭtraleco ebligis al UEA havi membrojn en ĉiuj partoj de la mondo eĉ en periodoj de grandaj internaciaj streĉitecoj. Ĝi ankaŭ ebligis, ke ĉe la sama tablo povis kaj povas egalece kaj amike sidi kaj diskuti apartenantoj de malsamaj rasoj, nacioj, religioj, politikaj konceptoj kaj lingvoj. Kiel montrite, rilate la socian kaj politikan aspektojn de la lingva problemo en la mondo, la Asocio ne estas nek povas esti neŭtrala, ĉar ĝi ja pledas por solvo pere de la Internacia Lingvo. Tial, tiu grupo de ĝiaj agadoj, bazitaj ĉefe sur la sciencaj esploroj de CED pri la lingva problemo en ĉiuj ĝiaj aspektoj, inkluzive la ekonomikan, socian kaj politikan, neniam elvokis kiun ajn seriozan riproĉon pro kvazaŭa malobservo de neŭtraleco.

Pro la fakto, ke la principo de neŭtraleco estis unue akceptita jam en 1908 kaj amendita en 1947-48, montriĝis utile rekonsideri la demandon por konstati, ĉu la nuna koncepto de neŭtraleco de UEA estas adekvata. La debato pri tiu demando okazis dum la UK en Londono (1971) kaj elvokis grandegan interesiĝon. La antaŭvidita salono kun ĉ. 300 sidlokoj estis tiel plenŝtopita, ke en la lasta momento necesis havigi plian ejon por tiuj, kiuj ne povis eniri. En la debato en ambaŭ salonoj partoprenis multaj personoj, inter ili ankaŭ reprezentantoj de asocioj kaj funkciuloj de lokaj societoj en landoj kun malsamaj politikaj sistemoj. En la fino de la longa diskuto estis voĉdono. Ĝi montris, ke la grandega plimulto de ĉeestantoj (verŝajne ĉ. 500 personoj kontraŭ nur 7) trovis, ke la nuna koncepto de neŭtraleco, kiel formulita en la Statuto kaj aplikata en la praktiko, estas adekvata kaj konforma al la bezonoj de la Asocio en la nuntempaj kondiĉoj.

Evidente, la du principoj — universaleco kaj neŭtraleco de UEA — estas tiel taŭge kombinitaj, ke ili apogas unu la alian konforme al la reciprokeco, kiu regas la universalecon kaj neŭtralecon de la Internacia Lingvo.

18.2.2 Unueco en Diverseco

La kunfandiĝo de 1947 certe estis pozitiva faro, pli ol necesa. Ĝi signifis formalan reunuigon de la neŭtrala Esperanto-Movado. UEA ekmarŝis sub la trafa devizo „Unueco estas Forto", sed devizo, eĉ la plej sencohava kiel tiu ĉi, per si mem ne sufiĉas. Por fakte kunigi la fortojn kaj efike direkti ilin maksimume unuece al plenumado de difinitaj taskoj kaj atingo de konkretaj celoj, necesis kaj plu necesos multe da pacienca konvinkado, ligita al paralelaj praktikaj aktivadoj. Pri tio konsciis ĉiuj klarvidaj membroj kaj funkciuloj de la unuiĝinta UEA ekde la momento de la kunfandiĝo.

18 KONSTRUADO DE MODERNA UEA (1948-1973)

En la Antaŭparolo al la Jarlibro de UEA por 1948, la nova prezidanto de la Asocio, E. Malmgren, emfazis la gravecon de la kunfandiĝo, sed samtempe atentigis:

> Estas tamen evidente — li skribis — ke per tia kunfandiĝo kolektiĝas personoj kun la plej diversaj opinioj kaj mondperceptoj, kaj tiel facile povos ekesti konfliktoj. Ni provu eviti tiujn konfliktojn por serĉi tiujn vojojn en nia komuna laboro por Esperanto, kiuj trovos la aprobon de ĉiuj aŭ de la granda plimulto.... Nin atendas centoj kaj miloj da taskoj, ĉirkaŭ kiuj ĉiuj esperantistoj povas kolektiĝi.

La diversecoj kaj malsamecoj en la Esperanto-Movado estas grandaj, el multaj vidpunktoj preskaŭ tiel senfinaj kiel la varieco en la mondo, kies parto ĝi estas.

La praktikantoj de la Internacia Lingvo apartenas al ĉiuj eblaj rasoj, nacioj kaj malpli grandaj etnaj grupoj, ĉiuj-ĉi kun propraj kulturoj kaj civilizacioj. Kvankam en la procezo de integriĝo rimarkeble malaperadas la iama ekskluziveco ankaŭ tiurilate, tamen la lingva obstaklo grave malhelpas pli rapidan proksimiĝon, kaj tial la influo de la pasinteco ankoraŭ sentiĝas tre forte. Siavice, la apartaj moroj kaj kutimoj, konsistaj partoj de unuopaj civilizacioj rezulte de longaj tradicioj, ofte kaŭzas ne nur malsamajn, sed kelkrilate eĉ kontraŭajn etikajn kaj estetikajn konceptojn.

Pro la universaleco de la Internacia Lingvo tiu stato necese reflektiĝas en la Esperanto-Movado. Estas senduba fakto, ke en la Internacia Lingvo iom post iom estas kreata kulturo tuthoma kaj enhave kaj forme; estas nekontesteble, ke la vastiĝanta internacia uzado de Esperanto konsiderinde helpas kaj helpos ĉiam pli la reciprokan komprenon de la ekzistantaj malsamecoj, parte eĉ ilian forigon; sed estas same certe, ke la apartaj kulturaj kaj civilizaciaj fonoj ja manifestiĝas ankaŭ en la Esperanto-kolektivo, kvankam multe malpli ol ekster ĝi. Tio okazas ĉefe en formo de malsameco de konceptoj kaj diferencoj rilate aprezadon de valoroj.

Plue, en la Esperanto-Movado estas reprezentitaj en pli aŭ malpli alta grado ĉiuj klasoj, sociaj tavoloj, profesioj kaj okupoj kun propraj specialaj interesoj. La personoj, kiuj ellernis kaj uzas la lingvon, estas anoj de diversaj religioj, aŭ nekredantoj kaj senreligiuloj. Laŭ siaj konvinkoj ili apartenas al multaj filozofiaj skoloj kaj politikaj partioj, aŭ havas sian propran vivfilozofion kaj aprobas neniun partion. Pro la esenca naturo mem de la Internacia Lingvo, adeptoj de ekstreme reakciaj partioj ne povas enesti. Se hazarde, pro stranga kaŭzo, iu el tiaj individuoj ellernas la lingvon, li povas dum kelka tempo vegeti kaj ĝeni per siaj konvulsiaj movoj, sed baldaŭ li formortas kiel fiŝo en freŝa aero. Tio estas avantaĝo.

El vidpunkto de edukiteco la diferencoj ne estas malpli grandaj. En la Esperanta lingvokolektivo la gamo etendiĝas de elementlerneja edukiteco ĝis la suproj de akademia klereco en diversaj branĉoj de naturaj kaj sociaj sciencoj. Feliĉe, tamen, forestas analfabetoj. Nur la infanoj, kiuj parolas Esperanton, sed ankoraŭ ne atingis la lernejan aĝon, ne scias legi kaj skribi. Tiurilate Esperanto estas unika en la familio de vivantaj lingvoj: ĝi estas la sola sen analfabetoj. Tio estas pozitiva. Sed restas la fakto de la grandaj diferencoj koncerne la gradon de edukiteco kiel plia obstaklo al unueco, se temas pri organizita agado por plua disvastigo de la lingvo.

Vid-al-vide de tiuj malsamecoj troviĝas la potenca faktoro de unueco. Malgraŭ la multflanka diverseco, malgraŭ ĉiuj diferencoj kaj naciaj kaj sociaj kaj ideaj, la Esperanto-kolektivon kunligas ne nur la lingvo kiel tia, sed samtempe, eĉ pli signife, ĝia supernacia karaktero kaj la fekunda funkcio kiun ĝi estas vokita plenumi en la fluado direktita al universaleco. Ĝuste tiu funkcio eksplikas kial la Internacia Lingvo altiris unuavice internaciismajn elementojn, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj transiras la limojn de ilia nacia, etna aŭ lingva teritorio, kiel indikas la Statuto de UEA. Kaj tiaj elementoj troveblas en daŭre kreskanta nombro en ĉiuj sociaj tavoloj, sur malsamaj niveloj de edukiteco, en diversaj religioj kaj politikaj partioj aŭ aliaj sociaj kungrupiĝoj. Diference de la opinioj esprimitaj de nombro da soci-politikaj gvidantoj kaj scienculoj, montriĝis, ke internaciismo ne estas karakteriza trajto nur de unu socia tavolo, ankoraŭ malpli ekskluziva monopolo de ununura politika partio. Humanisma internaciismo estas ĝenerala socia fenomeno, disvastiĝanta en multnombraj sociaj medioj de progresemaj fortoj, kvankam en iuj el ili pli ol en aliaj.

La Esperanto-Movado prezentiĝas ne kiel ebena surfaco, sed kiel konstruaĵo de buntaj diversecoj kaj malsamecoj, inter si dividitaj kaj kunligitaj per sontralasaj platoj de naciaj-teritoriaj apartaĵoj horizontale, kaj de sociaj, politikaj aŭ alispecaj apartenoj vertikale aŭ diagonale, sed ĉio-ĉi kuntenata de unueca lingvo, kun ĉiuj ĝiaj kromefikoj, kaj de unueca strebado al ĝia ĝeneraliĝo.

La skizita realaĵo, daŭre ŝanĝiĝanta kaj moviĝanta, speguliĝas en la konsisto de UEA. Ĝi estas universala ne nur laŭ teritoria etendiĝo, sed ankaŭ laŭ socia-kultura konsisto, el vidpunkto de profesioj, fakoj, okupoj kaj specialaj interesoj, reprezentitaj en ĝi, eĉ laŭ la aĝo de la membraro.

La vasteco de UEA precipe reliefiĝas, se oni komparas ĝin kun la aliaj internaciaj privataj unuiĝoj, la t.n. neregistaraj organizaĵoj. El ĉ. 2.700 da ili, nur kelkaj estas pli grandaj nombre, tre malmultaj atingas la geografian etendiĝon de UEA, sed neniu estas tiel tutece

universala kaj horizontale kaj vertikale, kiel UEA. Ilia membraro kutime konsistas el personoj apartenantaj al samaj fakoj kun egalaj profesiaj kvalifikoj, aŭ al samaj religioj kun similaj efikaj konceptoj, aŭ al politikaj partioj kun identaj celoj, k.s. UEA kovras sub sia tegmento ĉiujn. En aliaj organizaĵoj, precipe en la pli grandaj, la reciprokaj kontaktoj de la membroj, aŭ la rilatoj inter ili kaj la internaciaj organoj de tiuj asocioj, estas minimumaj aŭ eĉ nulaj, ĉefe pro la lingva obstaklo; tial ĉio, aŭ preskaŭ ĉio, fakte troviĝas plene en la manoj de iliaj gvidaj komitatoj. En UEA, male, la uzo de komuna lingvo ebligas ampleksan skriban kaj parolan komunikadon de la membroj inter si kaj kun la centraj organoj de la Asocio. Pri tio oni prave povas fieri. Ĝi estas unu el la realigoj de la fundamenta funkcio de la lingvo. Se regas korekta kompreno pri la objektive ekzistantaj malsamecoj, tial ankaŭ toleremo por la vidpunktoj de aliaj, kaj se tiuj vidpunktoj ne transiras la limojn de la senco mem, pro kiu UEA ekzistas, la ĉiuflankaj opiniinterŝanĝoj estas ne nur utilaj, sed absolute necesaj por formiĝo de vere komuna platformo kiel sintezo de malsamecoj: por konstruado de la organiza unueco en diverseco.

Tamen, neeviteble, la uzo de unusola lingvo ebligas ankaŭ en UEA esprimiĝon de ekstremismaj starpunktoj kun fortaj centrifugaj tendencoj. Du specoj estas klare distingendaj:

Kelkfoje temas pri konscia misuzo de diferencoj kun la celo intence inciti malkonkordon kaj kaŭzi disrompon por kontentigi siajn proprajn troajn ambiciojn, aŭ pro diversaj aliaj personaj motivoj kaj privataj interesoj. Tiaj negativaj fenomenoj, kiom ajn bedaŭrindaj, estas almenaŭ kompreneblaj, ĉar, tutsimple la universaleco de la lingvo inkluzivas la eblecon utiligi ĝin por kiu ajn celo. Sed en la kadro de UEA mem la universaleco tiurilate ne povas identi kun la universaleco de la lingvo. La universalecon de la Asocio limigas la koncepto pri unueco en diverseco, la celoj kaj rimedoj por atingi ilin, la reguloj pri la membreco, ĉio-ĉi formulita en la demokrate akceptita nuna Statuto kiel deviga por ĉiuj. Tial necesis aŭ ignori tiun ĉi kategorion de negativaĵoj, aŭ, se ili serioze minacis la unuecon, firme kontraŭbatali ilin.

Tute alian specon de problemoj kaŭzas ne la misuzo, sed la nekono aŭ nekompreno de malsamecoj, kun la akompana foresto de mondaj perspektivoj kaj rilate la signifon de la lingvo kaj koncerne la rolon de UEA. Rezulte, unuopuloj aŭ apartaj grupoj inklinas sincere rigardi siajn proprajn ideojn aŭ konceptojn, ofte objektive ekstremajn, kiel ĝenerale validajn. Sekve, ili klopodas altrudi siajn ekskluzivajn vidpunktojn al la tuta UEA kiel tia, ne komprenante, ke per tio ili fremdigas ĉiujn aliajn sekciojn de la Asocio kaj tial

malfortikigas ĝian unuecon, necesan por la realigado de ĝiaj celoj kaj utilan por ĉiuj, inkluzive eĉ la politike ekstremajn aŭ alimaniere ekskluzivajn grupojn. Se, ekzemple, UEA kliniĝus antaŭ la premoj de kiu ajn el la politikaj ideoj kaj ligiĝus nur al unu ideologio kun internaciisma karaktero, tio aŭtomate forigus el ĝiaj vicoj la adeptojn de ĉiuj aliaj ideologioj kaj movadoj kun simila internaciisma elemento. La unueco estus definitive rompita kaj la bato grandega, ĉar ne plu ekzistus forta reprezenta organizaĵo por progresigo de la Internacia Lingvo. Tial, tutcerte grave suferus la plua disvastiĝado de Esperanto. Signifas, ke ankaŭ la komunika potencialo de la lingvo estus kripligita, kaj tio estus malutila eĉ por la aktivuloj en politikaj movadoj, kies intereso ja estas havi kiel eble plej grandan internacian publikon kun scio de Esperanto por povi informadi ĝin pri siaj ideoj kaj eventuale altiri ĝin al sia flanko. La malkapablo fari tiun simplan logikan dedukton el klaraj premisoj kaŭzas nekomprenon, ke la unueco de UEA kun lojala konsidero de la diferencoj estas plia antaŭkondiĉo de ĝia ekzisto mem kaj tial utila por ĉiuj. Tiu nekompreno prezentiĝas kiel faktoro de disrompo, kvankam la koncernatoj verŝajne ne konscias pri la danĝero, nek deziras detruon de la Asocio. Konforme al la principo, ke estas pli bone ĝustatempe preventi, ol tro malfrue penti, fortostreĉoj ne estis ŝparataj por haltigi aŭ almenaŭ maksimume limigi tiujn tendencojn, kaj por ekspliki la implicitajn minacojn por la unueco de UEA. La saman sencon havas ankaŭ tiuj ĉi linioj, des pli aktualaj, ĉar en la lastaj jaroj denove manifestiĝis tiaspecaj tendencoj. Espereble iam venos la tempo, kiam la tuta membraro senescepte komprenos, ke ne la malsameco de politikaj kaj aliaj ideoj obstaklas unuecon, sed unuflanka altrudado de siaj propraj tiaspecaj konceptoj kiel ekskluzive validaj por la tuta UEA.

La samo koncernas religiajn aŭ similajn konceptojn, aŭ ideojn bazitajn nur sur specifaj naciaj aŭ pli vastaj regionaj konceptoj, se ili tendencas altrudiĝi kiel ĝeneralaj kaj tial, fakte, ekskluzivaj el vidpunkto de aliaj. Ĝuste tial necesis kaj ĉiam necesos atenti, ke en la centraj organoj de la Asocio estu maksimume reprezentitaj la grandaj kulturoj kaj civilizacioj de la mondo, por ke estu daŭre korektataj la eblaj unuflankaj vidpunktoj, fremdaj por la aliaj kaj malutilaj por la unueco. En la Komitato de UEA, pro ĝia strukturo prezentota poste, tio aŭtomate okazas. En la Estraro kaj en la Centra Oficejo tiu principo ne ĉiam povis esti realigita, kio kelkfoje elvokis malfacilaĵojn en la formulado de ĝenerale akceptindaj pozicioj kaj en la laboro konforme al la agadprogramoj.

En la sama kategorio de centrifugaj tendencoj, kaŭzitaj unuavice de nesufiĉaj kono kaj kompreno, troviĝas la troigitaj emfazoj de

apartaj agadsferoj kun samtempa neglektado aŭ eĉ subtaksado de ĉiuj aliaj.

Kvankam respondecosentaj membroj kaj funkciuloj devas ofte okupiĝi pri iuj plenumendaj taskoj eĉ kontraŭ siaj personaj gustoj, tamen estas tute nature, ke ankaŭ en la kadro de UEA la granda plimulto emas dediĉi siajn fortojn antaŭ ĉio al tiuj aspektoj, kiujn ili pleje ŝatas kaj por kiuj ili sentas sin kompetentaj. Bona laboro sur kiu ajn speciala sektoro, eĉ la plej eta, estas pozitiva per si mem, apogas la agadojn sur aliaj sektoroj kaj kontribuas al la progreso de la tuto. Se la personoj kun intereso centrigita al unusola agado, aŭ al ĝia nura frakcio, konscience plenumas sian taskon kun konscio pri ĝiaj kunligiteco kun la aliaj kaj valoro por la tuto, des pli bone. Tio kuraĝigas la koncernajn aktivulojn kaj fortikigas la unuecon. Se, male, unuopuloj komencas rigardi siajn agadojn sur apartaj kampoj kiel sole decidajn kaj ekskluzivajn, tuj komenciĝas la danĝero de diserigo.

Ekzemple, se iuj opinias, ke trafa informado, aŭ instruado de la lingvo ĝenerale kaj speciale en lernejoj, aŭ la Esperanto-literaturo, aŭ pragmatismaj praktikaj servoj, aŭ la uzo de Esperanto por sciencaj kaj fakaj celoj, aŭ kiu ajn alia aspekto estas grava, ili tutcerte pravas, ĉar ĉiu el la sektoroj de la longa kaj profunda fronto gravas kaj per si mem kaj por la tuto. Sed se ili, ĉefe pro manko de tutecaj perspektivoj, insistas pri nur unu el la multnombraj facetoj, postulante por ĝi ne sole prioritaton, sed eĉ ekskluzivecon, tiam ili pekas kontraŭ la universaleco de la lingvo kaj eraras rilate la rolon de UEA. Ĝia tasko ne estas favori nur unu flankon, sed flegi paralele, egale kaj adekvate ĉiujn aspektojn kondukantajn al la progresigo de la tuto. Tion koncize esprimas ĝia dua devizo: „Per UEA al la fina celo".

Ofte tiaj absurde unuflankaj sintenoj kaŭzas temporabajn diskutojn kaj malutilajn tensiojn. En ekstremaj kazoj ili kondukas al subfosado de unueco. Se temus nur pri apartiĝo de iu grupeto disde UEA kaj pri ĝiaj klopodoj antaŭenigi la lingvon laŭ siaj individuecaj ideoj, la afero ja estus bedaŭrinda, sed ne tro malbona. Finfine, iusence estas eĉ utile, ke personoj, kiuj neniel povas adaptiĝi al la elementaj postulatoj de demokrateco, esencaj por kia ajn kolektiva laboro, apartiĝu kaj agu memstare, kondiĉe ke tiu agado estu fruktodona. Ankaŭ tia laboro, kvankam farata ekster la kadro de UEA, kontribuas al la disvastigo de la lingvo kaj tiel apogas la celojn de la Asocio.

La veran malbonon kaŭzas konsciaj sinapartigoj kun tute alia karaktero. La ĉeno de la eventoj kutime sekvas jenan iom longan skemon: unue, propono al la Komitato aŭ alia kompetenta organo

de UEA, kiu, diskutinte ĉiuflanke la aferon, trovas ĝin nerealigebla en la proponita formo kaj tial malakceptas, sed samtempe sugestas al la proponinto pli realecan projekton, kiun li, konvinkita pri la absoluta praveco de sia vidpunkto kontraŭ la opinio de la grandega plimulto aŭ eĉ de ĉiuj, siavice rifuzas; sekvas malobservo de la demokrate farita decido per iniciato de memstara agado, kiu en sia originala ambicia formo kun adekvata pompa titolo, estas anticipe kondamnita je kompleta fiasko pro amatoreco, ignorado de faktoj kaj eblecoj, manko de fakaj scioj kaj malhavo de materiaj rimedoj; paralele disvolviĝas senprincipaj atakoj kontraŭ UEA kaj dissemado de malkonfido je la prudento de ĝiaj organoj, kiuj, jen, ne komprenas la epokfaran novan kampanjon, kondukantan la lingvon al la „fina venko" en spektakle mallonga tempo de kelkaj jaroj; la lastan stadion markas plena malsukceso, klare antaŭvidita de ĉiuj konantoj de la tuta kompleksecо kaj komplikeco de la lingva problemo, seniluziiĝoj de la iniciatintoj kaj, eĉ pli grave, de la allogitoj per impresaj promesoj pri la venko sur la sojlo, precipe se ili finance kontribuis.

Kompreneble, tiaj devojiĝoj certe vundas la unuecon. Krome, ilin necese akompanas aro da aliaj negativaj sekvoj interne de la Movado: fortreno de fortoj, eĉ se etaj kaj modestaj, desur kampoj, kie ili povas esti utilaj; limigo de la financa potencialo de la Movado; malŝparo de tempo kaj tial, fakte, bremsado de la progreso; perdo de adeptoj, eĉ se nur de kelkaj, pro absolute superfluaj seniluziiĝoj. Fine, kaj certe plej malbone, tiaj misagadoj kompromitas la lingvon kaj la seriozecon de la Esperanto-Movado en la publika imago, precipe en sciencaj medioj, pro la okulfrapa malproporcio inter la pretendaj titoloj kaj deklaritaj celoj, unuflanke, kaj la personaj kvalifikoj, disponeblaj rimedoj kaj aplikataj metodoj, aliflanke. Espereble iam oni lernos el la faritaj eraroj.

La supraj koncizaj komentoj helpos kompreni la malfacilaĵojn kaj obstaklojn renkontitajn dum la lastaj 25 jaroj en la konstruado de unueca UEA.

La formulo estis kaj restas simpla: unueco en diverseco kaj diverseco en unueco. Tio signifas, unuflanke, unuigi ĉion, kio estas komuna al ĉiuj konsistaj partoj de UEA kaj, aliflanke, maksimume helpi la laboron sur landa, loka, faka aŭ alispeca niveloj, tiel ke ĉiu sentu la avantaĝojn de unueco kaj ĉio kontribuu al atingo de la celoj. Same tiel ĝi signifas centrigi tiujn agadojn, kiujn povas efike plenumi nur la centraj organoj de la Asocio; malcentrigi la taskojn, kiujn plej sukcese povas realigi la respektivaj teritoriaj kaj fakaj organizaĵoj; kaj harmoniigi la tutan laboron.

Al la unua grupo apartenas, ekzemple, reprezentiĝo antaŭ internaciaj instancoj, universalaj kongresoj kaj aliaj gravaj internaciaj konferencoj, sciencaj esploroj kaj dokumentado rilatantaj al la lingva problemo kaj uzeblaj de la tuta Movado, bazaj principoj de informado aplikeblaj ĉie kaj rekta monda aktivado en tiu sfero, internaciaj lernolibroj kaj ekzamenoj, ĉefaj internaciaj periodaĵoj, internaciaj praktikaj servoj, mondaj kampanjoj kun komunaj konkretaj celoj, kaj multaj aliaj agadoj, prezentotaj sube en Ĉap. 18.5 La dua grupo konsistas el taskoj kun landa, loka aŭ faka karaktero, kies realigon la centraj instancoj de la Asocio kuraĝigas kaj helpas, sed kiujn sole la respektivaj organizaĵoj povas sukcese plenumi sur siaj teritorioj aŭ en siaj fakaj rondoj. Tiaj, ekzemple, estas la reprezentiĝo ĉe landaj kaj lokaj aŭtoritatoj aŭ fakaj instancoj, informado pri Esperanto kaj disvastigo de la lingvo en la respektivaj medioj, landaj kaj fakaj kongresoj, regionaj kaj lokaj kunvenoj, nacilingvaj lernolibroj kaj diversgradaj kursoj, fakaj vortaroj kaj literaturo, landaj aŭ fakaj periodaĵoj, ktp.

La Statuto kaj ambaŭ Bazaj Laborprogramoj de UEA — tiu de 1955 kaj la alia de 1962 — estas ellaboritaj precize laŭ tia konceptado de unueco en diverseco. La Statuto larĝe malfermas la pordon por aliĝo de ĉiuj landaj asocioj kaj fakaj organizaĵoj al UEA. Eĉ tute malgrandaj landaj asocioj kun minimume 25 membroj povas aliĝi laŭ la nun valida Statuto. La kotizo por ĉiu asocia membro (AM) de nur 0,50 ned.gld. estas tiel malalta, ke ne ekzistas organizaĵo, kiu ne povus alfronti tiun minimuman elspezon por ĉiu sia membro. Ĉiuj aliĝintaj LA kaj FA estas reprezentitaj en la Komitato kiel supera organo de la Asocio kaj tiel partoprenas en la formulado de la politiko de UEA kaj decidado pri ĉiuj gravaj demandoj. UEA kuraĝigas kontraktajn rilatojn pri kunlaboro kaj reciproka helpo kun la fakaj organizaĵoj, kiuj pro kiu ajn kaŭzo ne deziras aliĝi al la Asocio. UEA etendas siajn manojn ankaŭ al neneŭtralaj internaciaj organizaĵoj kaj proponas al ili kunlaboron en ĉiuj rilatoj, sed sub kondiĉo, ke tia kunlaboro estu konforma al la neŭtraleco de la Asocio. Fine, ĉiu ajn honorinda unuopulo povas fariĝi individua membro de UEA en diversaj kategorioj: UEA neniam interesiĝis pri la politikaj aŭ aliaj opinioj de sia membraro. Ankaŭ la individuaj membroj partoprenas en la laboro de la Komitato tra la komitatanoj B, kiujn elektas la delegitoj. Pli vastaj eblecoj por aliĝi kaj kunlabori en la sino de UEA ne estas imageblaj. La fundamenta senco de tiu vasteco estas kunligi ĉiujn pozitivajn fortojn en potencan fronton por faciligi la progresigon de la Internacia Lingvo en la intereso de ĉiuj.

Eble oni demandas sin kial estas necesa forta kaj unueca UEA. Ĝi certe ne estas celo al si mem. Forta UEA, unueca en diverseco,

kun multnombra membraro estas necesa kaj el la vidpunkto de la prestiĝo, kaj el tiu de la praktika utiligo de la lingvo. Ankaŭ en tiu ĉi kazo kvantaj kreskoj en difinita momento transformiĝas en novajn, pli altgradajn kvalitojn. Ju pli da membroj havas UEA, des pli forte kaj prestiĝe ĝi povas aŭdigi sian voĉon kaj des pli efike kaj sukcese ĝi povas labori por Esperanto. Plue, ju pli da membroj, des pli granda la versajno, ke inter ili troviĝos pli da talentaj kaj kompetentaj aktivuloj, pli da personoj kun elstaraj pozicioj en la socio, kio per si mem altigas la prestiĝon de UEA. Fine, sed ne malplej grave, la nombro de la membroj estas multrilate decida ankaŭ el financa vidpunkto. Neniu postlasis al UEA — almenaŭ ne en la lastaj jaroj — grandajn heredaĵojn, nek ĝi ricevas subvenciojn de iuj fondaĵoj. Finance UEA vivas ĉefe el la kotizoj de la individuaj membroj. Ju pli da membroj ĝi havas, des pli grandaj estas la enspezoj kaj des pli vasta povas esti la agado. Siavice, la vastigo de la agadoj altiras novajn membrojn. Tiele, ankaŭ tiurilate regas kunligiteco kaj interdependeco.

Apenaŭ necesas diri, ke la principo de neŭtraleco, kiel formulita en la nuna Statuto, kaj ĝia racia apliko en la ĉiutaga praktiko de la Asocio, estis kaj plu estas unu el la plej esencaj kondiĉoj de unueco en diverseco. Mortigo de neŭtraleco egalas al mortigo de unueco.

Kvankam en la pacienca kaj laŭgrada konstruado de unueco kun respekto por la diferencoj estas farita grandega paŝo antaŭen kompare kun 1948, tamen la rezultoj povus esti eĉ pli kontentigaj, se ĉiuj komprenus la decidan signifon de tiu principo por la estonteco de la Internacia Lingvo. Bedaŭrinde, ankoraŭ tre multaj plu staras flanke. Eble tial, ĉar ili, aŭ almenaŭ parto de ili, perdis iom la fidon ne pri Esperanto, sed pri la ŝancoj de ĝia rapida ĝeneraliĝo en malfacilaj kondiĉoj kaj kompleksa internacia situacio. Se tiel, ili ne komprenas, ke almenaŭ unu el la kaŭzoj, pro kiuj la disvastiĝo de Esperanto ne progresas pli rapide, estas precize ilia komforta pasiveco. Se ili ĉiuj estus membroj de UEA, ĝia tasko estus pli facila kaj la progresado certe pli rapida. La minimumo, kiun ĉiu praktikanto de la Internacia Lingvo povas doni, estas apogi almenaŭ per sia membreco la organizitan, laŭplanan laboron de UEA.

La du devizoj — „Unueco estas forto" kaj „Per UEA al la fina celo" — plu restas validaj.

18.2.3 Kunligiteco kaj Interdependeco

En alia senco unueco en diverseco egalas al kunligiteco kaj interdependeco de unuopaj agadoj. Unuavice tio rilatas al la tri ĉefaj branĉoj: informado, instruado kaj praktikaj aplikoj. Vane oni faras eĉ la plej bonan informadon pri la Internacia Lingvo, se oni paralele

ne prezentas taŭgajn eblecojn por lerni ĝin. Klopodoj instrui la lingvon en medio neinformita kaj sen antaŭpreparoj tre verŝajne ne donos rezulton. Lernado de Esperanto kiel celo al si mem, sen eblecoj de praktikaj aplikoj, apenaŭ havas sencon. Aliflanke, praktikaj aplikoj de la lingvo estas maleblaj, se ne ekzistas personoj, kiuj scias ĝin. Nur kunligiteco de la tri garantias realan kaj daŭran progreson. La samo koncernas ĉiun unuopan eron da aktivado interne de la tri grandaj branĉoj. Oni ne povas evoluigi kaj kreskigi la Esperanto-literaturon, se samtempe ne kreskas la nombro de personoj, kiuj scias la lingvon. Ne estas eble ampleksigi la sciencan kaj fakan verkaron, se ne troviĝas kompetentaj legantoj en la respektivaj sciencaj branĉoj kaj fakoj. Se oni ne volas ridindigi sin mem kaj la aferon, por kiu oni pledas, oni ne povas alparoli homojn surstrate en la Internacia Lingvo antaŭ ol ĝi estos tiel disvastiĝinta, ke la alparolitoj konas ĝin, aŭ almenaŭ ke ekzistas minimume verŝajno pri tio. Unu el la kaŭzoj, pro kiuj estas utile porti ĉiam la Esperanto-insignon (ne multajn, sed unusolan), estas indiki sian lingvoscion kaj tiel helpi al tiaspeca plej ordinara praktika uzo. Oni povus ankoraŭ longe daŭrigi la vicigon de ekzemploj por montri la kunligitecon kaj interdependecon de ĉiuj aspektoj, aplikoj kaj agadoj. Tamen, ankaŭ tiu simpla vero ne ĉiam estas same simple komprenigebla.

Eĉ pli klare ol la Statuto, ambaŭ Bazaj Laborprogramoj de la Asocio indikas la interdependecon kaj kunligitecon de la agadoj.

La Unua Baza Laborprogramo de UEA (1955) menciis en la Enkonduko la unuarangan signifon de la rekono de Unesko (1954) kaj emfazis:

> Por vaste utiligi tiun ekiritan pozicion estas necese plani ĉiujn aktivecojn de la Asocio por la sekvantaj jaroj ekstere kaj interne. Ĉiu limigo al nur unu aŭ kelkaj branĉoj povus, eble, doni rezultojn en la elektitaj aferoj, sed ne havus grandan valoron por la tuto, nome por la ĝenerala, tre vasta progresigo de la Internacia Lingvo.

En la konkluda parto de la Programo estis ankoraŭfoje akcentite, ke „nur la paralela agado en ĉiuj supre menciitaj direktoj certigas la sukceson".

La Dua Baza Laborplano de UEA (1962) estas multe pli ampleksa ol tiu de 1955. Ĝi konsistas el kvin partoj, 28 sekcioj kaj 136 eroj, ĉiu el ili rilatanta al aparta tasko. Tamen ĝi prezentas unuecan tuton. La ampleksecon de la programo, la kunligitecon kaj interdependecon de la unuopaj eroj, la taskojn de ĉiuj organizaĵoj kaj unuopuloj koncize resumas jenaj vortoj el la konkluda parto:

> Ne nur la centraj organoj de UEA, sed ankaŭ ĉiuj organizaĵoj apartenantaj al ĝi kaj ĉiu unuopa membro devas scii kien oni iras kaj kiujn celojn oni deziras atingi. Sciante tion, ĉiu organo de la Asocio kaj de la unuopaj organizaĵoj, kiel ankaŭ ĉiu individua membro, povos doni efikan helpon en plena konscio, ke agante sur unu el la niveloj — internacia, landa, loka aŭ faka — li kontribuas al la ĝenerala progresigo de la Internacia Lingvo. Ĉiuj eroj de la programo estas same gravaj kaj dependaj unu de la alia. Ankaŭ la laboro sur kiu ajn nivelo, en kiu ajn el la organoj aŭ organizaĵoj, estas egale grava. Nur sukcesa plenumo de ĉiuj eroj garantias la sukcesan realigon de la Laborplano kiel tia kaj, rezulte, la proksimiĝon al la fina celo aŭ eĉ ĝian atingon en la proksima estonteco.

En la komenta artikolo, publikigita en *Esperanto* de oktobro, 1962, post la akcepto de la Laborplano fare de la Komitato, estis, interalie, dirite:

> Ne nur ĉiuj partoj, punktoj kaj eroj de la Laborplano estas reciproke tiel kunligitaj, ke malatento al unu malutilas al la tuto kaj povas eĉ endanĝerigi ĝin, sed, ĝuste tial, ankaŭ la personoj respondecaj por la plenumo dependas unu de la alia kiel ĉeneroj en longa, ŝtala ĉeno.

La realigado de la du programoj kaj de la specialaj agadplanoj okaze de pluraj grandaj kampanjoj [10] aktivigis ĉiujn branĉojn, sekciojn, organojn kaj multajn membrojn de la Asocio. Tiu fakto mem, eĉ senkonsidere al la plenumo de esence gravaj taskoj antaŭviditaj en la du bazaj programoj kaj specialaj agadplanoj, efikis kohere rilate la agadojn, kun la plia rezulto, ke ĝi trae fortikigis la unuecon.

18.2.4 Demokrateco kaj Memdisciplino

Ĉiuj statutoj de UEA, ekde tiu de 1908 ĝis la nuna kiel reviziita en 1956, estis bazitaj sur la principo de demokrateco. Ne povas esti alimaniere en kazo de kiu ajn libervola socia-kultura organizaĵo. Malpli ol en kiu ajn alia, en monda asocio celanta disvastigi universale homan lingvon, kiu apartenas al neniu aparta persono, eĉ ne al ĝia iniciatoro, sed estas intelekta proprieto de ĉiuj uzantoj kaj, potenciale, de la tuta homaro.

En la koncepto de demokrateco estas implicitaj almenaŭ du fundamentaj ideoj, el kiuj fontas ĝiaj ceteraj konsistaj elementoj: libereco en esprimado de opinioj kaj regulo de plimulto en farado de decidoj. Ili estas aplikataj en ĉiuj demokrate organizitaj socioj kaj ĉiaspecaj kolektivoj, sed tio neniel signifas, ke la konkretaj aplikoj

10. Ekzemple okaze de la Peticio al Unesko en 1952-54, Zamenhof-Jaro (1959), Jaro de Internacia Kunlaboro (1965) k.a. V. ankaŭ Ĉap. 18.5

estas identaj. Ekzistas grandegaj diferencoj kaj koncerne la formojn, en kiuj demokratioj funkcias (ekzemple senpera aŭ reprezenta demokratio), kaj en rilato al la grado de demokrateco (ekzemple la vasteco de fakta partopreno en la decidado).

Kompare kun kiu ajn alia internacia organizaĵo sen neŭtrala komuna lingvo, UEA estas sendube la plej demokrata el vidpunkto de la eblecoj esprimi pensojn kaj interŝanĝi opiniojn en monda amplekso. En la aliaj organizaĵoj, nome en tiuj kun naciaj lingvoj kiel oficialaj aŭ laboraj, la diskutoj estas necese limigitaj pro la lingvaj baroj, tiel ke vastaj sekcioj de la membraro estas aŭtomate senigitaj de sia demokrata rajto esprimi sin libere kaj senĝene, ĉu skribe ĉu parole, pri kiu ajn demando. Ju pli granda la organizaĵo teritorie kaj nombre, des pli malgranda tiu rajto por la tuta membraro. Aldone al aliaj nedemokrataj konsekvencoj, la malebleco komunikadi kaŭzas, ke la decidofara povo restas en la piramida supro kaj neniel kapablas descendi al la pli larĝaj tavoloj de la membraro, eĉ se oni sincere dezirus tion. Male, en UEA, pro la foresto de la lingva obstaklo, la membraro ĉiam posedis la necesan instrumenton por esprimiĝi kaj por interŝanĝi opiniojn kun la aliaj ĉu parole dum renkontiĝoj, ĉu skribe kun personoj eĉ en la plej malproksimaj regionoj de la mondo. La sola eventuala limigo por unuopulo povas esti lia propra nekontentiga lingva nivelo, malhelpanta lin esprimi sin adekvate. Sed pri tio, evidente, ne respondecas demokrateco, nek kulpas la instrumento, egale akirebla de ĉiuj en relative mallonga tempo, depende iom de la talento kaj multe pli de la dediĉita fortostreĉo. Dum en la menciitaj organizaĵoj la lingva obstaklo kaŭzas kontraŭdemokratan malegalecon, en UEA la uzo de neŭtrala lingvo prezentiĝas kiel plia elemento de demokrateco: la plena egaleco de la membroj el lingva vidpunkto, kun ĉiuj pozitivaj sekvoj de tiu egaleco por la demokrateco.

Tiom, tute principe, pri la demokrataj eblecoj, kiujn prezentas la uzo de la Internacia Lingvo en UEA. Ili ekzistis same tiel en 1908 kaj poste, kiel en 1973. Pro la nombra grandiĝo kaj geografia etendiĝo de UEA, nuntempe ilia valoro estas eĉ pli rimarkinda, ol antaŭe.

Alia afero estas konscie konstrui tian internan demokratan maŝinaron, kiu, bazita sur la skizitaj eblecoj de lingva komunikado, maksimume favoros interŝanĝon de ideoj, diskutojn kaj debatojn, decidadon sur ĉiuj niveloj, inkluzive la tutan membraron. Tiurilate UEA estas hodiaŭ certe pli demokrata ol iam antaŭe. Plue, prenante en konsideron ĉiujn decidajn komponantojn de demokrateco, oni certe ne troigas, se oni asertas, ke UEA estas la plej demokrata el ĉiuj internaciaj organizaĵoj en la mondo.

La interna demokratigo de la Asocio, konceptita jam en 1947-48

kiel unu el la bazaj taskoj, povis esti realigita nur etapon post etapo, paralele kun la tuta modernigado de UEA, ofte ne sen grandaj rezistoj.

Kompreneble, ĉiu demokratio enhavas danĝerojn de misuzo. Ju pli alta la grado de demokrateco, des pli grandaj la riskoj kaj des pli oftaj la faktaj misuzoj de la demokrataj institucioj fare de nedemokrataj elementoj. Sed demokratio devas fronti la riskojn kaj permesi eĉ misuzojn ĝuste tial, ĉar ĝi estas demokratio. Nur la plej danĝeraj misuzoj, atencantaj la esencon mem de demokratio, ne estas allaseblaj, kaj ĉiu sana demokratio antaŭvidas ankaŭ la necesajn rimedojn por protekti sin kontraŭ detruiĝo.

En UEA la plia demokratigo estis necesa ne nur pro la principa kaj senkondiĉa valoro de demokrateco kiel tia, sed ankaŭ tial, ĉar, sen maksimume demokrataj institucioj, la aliaj bazaj konceptoj, pritraktitaj supre, komplete perdus sian sencon. En la konstruado de la moderna UEA la plia demokratigo estis kaj devos resti la kunliga cemento de ĉio cetera. Ankaŭ en UEA la risko de misuzoj estis granda, kaj pluraj misuzoj, eĉ gravaj, ja okazis, sed en la fina bilanco la pozitiva flanko abunde superis la negativan: ĝi helpis la kreon de forta, moderna UEA kun prestiĝa pozicio en internaciaj rilatoj.

En kio konsistas la demokratiĝo?

Necesas komenci de la bazo mem: la tuta membraro. Laŭ la Statuto de 1908 UEA konsistis nur el individuaj membroj, kaj ĝiaj celoj estis grandparte limigitaj al praktika utiligo de la lingvo, ĉefe por la membraro. Tio determinis la rajtojn. Kvankam la koncernaj reguloj de la Statuto estis poste iom modifitaj, tamen ankoraŭ en 1933, do senpere antaŭ la Interkonsento de Kolonjo, nur parto de la membraro povis en kiu ajn senco partopreni en la elektoj kaj en decidado. La tiamajn komitatanojn elektadis nur la delegitoj, vicdelegitoj kaj ĉefdelegitoj de la Asocio, sed ne la ceteraj membroj. En 1920 la sorton de UEA decidis precize 630 personoj; en 1931 tiu nombro altiĝis al 2.484, t.e. malpli ol triono de la membraro; nuntempe, kiel montriĝos poste, la fina sorto de la Asocio troviĝas en la manoj de la tuta membraro. Post la interkonsento de Kolonjo (1933) UEA fariĝis iaspeca federacio de landaj asocioj (LA) kaj individuaj membroj. Laŭ la Statuto ellaborita post la Kolonja Interkonsento, la gvidado de la Asocio troviĝis en la manoj de la Centra Komitato, kiun elektadis la landaj asocioj, unuflanke, kaj la ĉefdelegitoj kaj delegitoj, aliflanke. Tio estis pli demokrata. Tamen, en la ĝenerala voĉdonado rajtis partopreni nur la „aktivaj", t.e. individuaj membroj, kaj ne la asociaj membroj (AM) aligitaj kolektive pere de la landaj asocioj (Art. 57). Tia voĉdono devis okazi, se ĝin postulis kvinono de la „aktivaj" membroj, aŭ se la Komitato tiel decidis. Eĉ pli,

ŝanĝojn en la Statuto povis decidi, laŭ komplika proceduro, eĉ ne ĉiuj „aktivaj" membroj, sed nur la ĉefdelegitoj kaj delegitoj en voĉdono iniciatita de la Komitato, aŭ de la Estraro, aŭ de kvinono de ĉiuj „aktivaj" membroj (Art. 58) [11].

La Statuto de Internacia Esperanto-Ligo (IEL) de 1936 estis parte pli demokrata, sed aliparte iom malpli, ol la antaŭa. Ĝi konservis la bazan principon por la elekto de la Komitato fare de la LA kaj individuaj membroj pere de la delegitoj, sed ĝi konsiderinde vastigis la rajtojn de la landaj asocioj, precipe en la t.n. ĝenerala voĉdonado. Aliflanke, la individuaj membroj, kiuj troviĝis en landoj sen aliĝintaj LA, ne havis voĉdonan rajton en la ĝenerala voĉdono. Ĝenerala voĉdono devis okazi, se la Komitato aŭ, en okazo de urĝeco, la Estraro ĝin decidis, aŭ se la aliĝintaj asocioj reprezentantaj kvaronon de la tuta membraro ĝin skribe postulis. En la voĉdono ĉiu aliĝinta LA havis nombron de voĉoj egalan al la nombro de siaj membroj, por kiuj estis pagita la kotizo por la antaŭa jaro. En la voĉdono validis la plimulto de la esprimitaj voĉoj. Por ŝanĝi la Statuton aŭ dissolvi la Ligon necesis tri kvaronoj de la esprimitaj voĉoj, kondiĉe ke tiuj lastaj voĉoj reprezentu almenaŭ duonon de la tuta membraro (Art. 41 de la Statuto de IEL).

La Statuto de 1948, nun same valida tiurilate, korektis tiun situacion favore al individuaj membroj en landoj sen aliĝinta LA. Aldone al la regulo ĵus priskribita, en landoj, kie ne ekzistas aliĝinta LA, la membroj voĉdonas individue (Art. 43). Tiamaniere, laŭ la nuna Statuto de UEA, la tuta membraro partoprenas en ĝenerala voĉdono ĉu rekte, ĉu pere de la aliĝintaj landaj asocioj. Oni atendas, ke la LA, antaŭ ol voĉdoni en ĝenerala voĉdonado, konsultos la propran membraron, kiu estas samtempe membraro de UEA, por ke la esprimita voĉdono maksimume reflektu la vidpunkton de la membroj. Dependas nur de la landaj asocioj ĉu fakte ili agas tiel, aŭ ili voĉdonas sen antaŭa prezento de la demando al la propra membraro por diskuto kaj decido. Multaj landaj asocioj efektive konsultis la membraron laŭ la reguloj de siaj resp. statutoj; aliaj kelkfoje neglektis tiun gravan aspekton de demokrateco. Se tiel, tiam ne kulpas tiu ĉi demokrata institucio de UEA, sed la cirkonstancoj en unuopaj landaj asocioj.

11. Laŭ tiu regulo okazis la fama ĝenerala voĉdono de 1936 pri la transporto de la sidejo el Ĝenevo en Londonon. Kvankam la proponon aprobis 80% de la delegitoj, la gvidantoj de la malplimulto malobservis la decidon kaj iniciatis kortumajn intervenojn. Ĝi estis unu el la plej gravaj malobservoj de la demokrata principo pri decidado per plimulto de ĉiuj voĉoj en la historio de UEA. Similaj, sed malpli gravaj, okazis ankaŭ poste. V. Ĉap. 14.3.5 kaj sube en 18.3.

18.2 BAZAJ KONCEPTOJ

Ekde 1936 entute okazis kvin ĝeneralaj voĉdonoj: en 1936 por ŝanĝi la sidejon de UEA [12]; en 1948 por aprobi la kunfandiĝon formulitan en la Statuto de 1948; en 1954-55 du fojojn por ŝanĝi la Statuton (vidu sube en 18.3); en 1956 por adapti la Statuton al nederlanda juro kaj samtempe por fari en ĝi kelkajn malgrandajn ŝanĝojn. Kompreneble, ĉiufoje estis aplikataj la reguloj validaj en la momento de voĉdono.

La vastigo de la demokrataj rajtoj de la landaj asocioj kaj de ĉiuj membroj vidiĝas ankaŭ el la reguloj rilatantaj al ĉefdelegitoj (ĈD), delegitoj (D), fakdelegitoj (FD), vicdelegitoj (VD), komitatanoj kaj aliaj funkciuloj de la Asocio.

En landoj, kies asocioj aliĝis, la LA nomas aŭ nomigas la delegitojn de ĉiuj kategorioj, interkonsente kun la ĉefdelegito. En aliaj landoj ĉiuj delegitoj estas nomataj de la ĈD aŭ peranto (kutime en lando kun malpli ol 15 D) aŭ direktoro de la CO; sed, se en iu loko aŭ regiono loĝas minimume 10 individuaj membroj, ili rajtas okazigi kunvenon kaj mem elekti siajn delegiton, ev. vicdelegiton kaj fakdelegitojn. La nomoj de la novaj delegitoj devas esti publikigitaj en la oficiala organo de la Asocio, kaj ĉiu membro rajtas protesti (Art. 10-11 de la Ĝenerala Regularo). La nomigo aŭ elekto fariĝas valida nur se, en tempolimo de 60 tagoj post la apero de la informo, neniu membro protestas pro grava kaŭzo. Se tia protesto alvenas, pri la valideco de la nomigo aŭ elekto decidas la prezidanto de la Asocio, sed, kompreneble, lia decido povas esti rekonsiderita de la Komitato laŭ la ĝenerala principo pri respondeco. Plue, en lando, kies LA aliĝis al UEA, la ĈD estas nomata de la koncerna LA interkonsente kun la ĝenerala sekretario de UEA; en lando sen aliĝinta LA la direktoro de la Centra Oficejo nomas la ĉefdelegiton aŭ, se necese, peranton.

Konforme al la pozicio de la landaj asocioj en la sino de UEA, en la fono de la reguloj pri la nomigo aŭ elekto de la funkciuloj en la delegita reto troviĝas ankaŭ la ideo de kunlaboro kaj konsento inter la centraj organoj de UEA kaj la respondecaj instancoj de la aliĝintaj LA. La reguloj taŭge kombinas du principojn: tiun pri la memstareco de la LA, inkluzive ilian agadon por Esperanto sur la respektivaj teritorioj, kaj la universalecan principon de UEA kun adekvataj devoj de la LA kiel kolektivaj membroj en la kadro de la Asocio. De la interna strukturo de ĉiu unuopa LA dependas ĉu kaj ĝis kiu grado ĝiaj lokaj societoj kaj membroj fakte partoprenas, rekte aŭ nerekte, en la decidado ankaŭ tiurilate.

La fakto, ke UEA laŭ la nuna Statuto konsistas el organizaĵoj

12. V. piednoton 11 en tiu ĉi Ĉap. kaj Ĉap. 14.3.5.

(kolektiva principo) kaj unuopuloj (individua principo), reflektiĝas en la Komitato kaj en la demokrata sistemo, laŭ kiu ĝi estas elektata. La komitato konsistas el komitatanoj A, elektataj de la aliĝintaj asocioj; komitatanoj B, elektataj de la ĈD kaj D; kaj komitatanoj C, alelektataj de la komitatanoj A kaj B. Ĉiu aliĝinta LA kun 150 ĝis 1.000 membroj elektas unu komitatanon, kaj unu plian por ĉiu komencita milo. Ĉiu aliĝinta faka asocio (FA) elektas unu komitatanon A senkonsidere al la nombro de siaj membroj. Aliĝinta LA kun malpli ol 150 membroj elektas unu observanton, kiu havas ĉiujn rajtojn, kiel la komitatanoj, kun la escepto de la voĉdona rajto. Aliflanke troviĝas la komitatanoj B, kiujn elektas la ĉefdelegitoj kaj delegitoj el internacia listo, pretigita laŭ la kondiĉoj de la Ĝenerala Regularo kaj laŭ la normo: unu komitatano B je 250 delegitoj. Kvin ĉefdelegitoj aŭ delegitoj rajtas proponi unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio; la kandidato devas skribe konsenti al sia kandidatiĝo. Surbaze de ĉiuj laŭregulaj kandidatigoj estas farata la menciita listo. Fine, por certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj, la komitatanoj A kaj B povas kompletigi la Komitaton, elektante pliajn komitatanojn per sekreta voĉdono ĝis kvarono de sia propra nombro. Foje elektitaj, ĉiuj komitatanoj estas absolute samrajtaj kaj reelekteblaj. La Komitato elektas la Estraron de la Asocio, kiu, siavice, nomas la direktoron de la Centra Oficejo. Ĉiuj decidoj de la Komitato kaj Estraro estas farataj per simpla plimulto de la voĉdonintoj, sed decidoj, kiujn partoprenis malpli ol duono de la Komitato aŭ de la Estraro, devas poste esti submetitaj al skriba voĉdono, en kiu sufiĉas la plimulto de la voĉdonintoj. Okaze de voĉegaleco decidas la prezidanto. Komitatano aŭ estrarano devas sin deteni de voĉdono pri aferoj, kiuj koncernas lin persone. Tiuj reguloj estis rigore observataj [13].

Grava elemento en la demokrateco de UEA estas la ĉeno de respondecoj: la geoficistoj de la CO, nomataj de la direktoro kun aprobo de la Estraro, respondecas al la direktoro; la direktoro, redaktoro, komisiitoj kaj komisionoj respondecas al la Estraro; la Estraro al la Komitato; la Komitato al la elektorganoj; tiuj lastaj, same kiel ĉiuj aliaj organoj kaj instancoj de UEA, al la tuta membraro tra la ĝenerala voĉdono, kiu povas nuligi ĉiujn decidojn kaj elektojn, aŭ esprimi sin pri ĉiuj ajn demandoj submetitaj de la Komitato. Krome, kiel prezentite supre, la ĝenerala voĉdono povas ŝanĝi la Statuton, aŭ eĉ dissolvi la Asocion.

Tiu vasta demokrateco implicas plurajn danĝerojn, el kiuj la ĉefa estas la risko de decidado sen sufiĉa kono de faktoj. Por maksimume eviti erarojn, la Ĝenerala Regularo antaŭvidas kelkajn garantiojn.

13. Detalojn pri la rolo de la Komitato, Estraro kaj C.O. v. sube en 18.4.2.

Kiel delegito povas esti nomita aŭ elektita nur individua membro en la kategorio de MA aŭ pli alta dum almenaŭ unu jaro antaŭ la jaro de la nomigo aŭ elekto. Ĉiuj komitatanoj devas estis MA de UEA dum almenaŭ tri jaroj antaŭ la jaro de la elektoj. Laŭ decido de la Komitato, farita en 1972, la sama regulo validas ankaŭ por la anstataŭantoj de komitatanoj A. La senco de tiu regulo estas redukti la eblecojn de eraraj konkludoj, aŭ eĉ de fatalaj decidoj, pro manko de scioj pri faktoj, laboro kaj funkciado de la Asocio. Oni povas atendi ke la MA, kiuj regule ricevas la Jarlibron kaj la ĉefan organon de la Asocio dum tri jaroj, povos akiri sufiĉe da scioj por bone orientiĝi, kio, principe, ebligas pli ĝustajn juĝojn kaj korektajn decidojn. Aldone, estus tre utile, se la kriterio por kandidatigoj kaj elektoj al la Komitato estus ne honorigo pro meritoj en la pasinteco (por tio ekzistas honora membreco), kiel kelkfoje okazas, sed kompetenteco, laboro kaj sindono, kiujn oni prave povas atendi de la kandidatoj pro iliaj aktualaj meritoj.

Plia garantio estas la periodeco de ĉiuj elektoj, kiel ankaŭ la ebleco por la decidpovaj korpoj esprimi al la elektitoj malkonfidon eĉ antaŭ la finiĝo de la trijara oficperiodo kaj elekti aliajn (Art. 3).

La konscia vastigado de la diskuteblecoj kaj publika kontrolo evoluis paralele kun la demokratigo de la elektosistemo kaj decidpovaj rajtoj.

Unuavice tio rilatas al la ĝeneralaj kunvenoj de la universalaj kongresoj kaj al ĉiuj aliaj tutkongresaj kunvenoj, ekzemple sekcioj, organizataj de tempo al tempo. Dum la ĝeneralaj kunvenoj ĉiu membro de la Asocio — kaj ankaŭ ĉiu alia kongresano — povas libere esprimi sian opinion, kritiki, fari demandojn kun la rajto ricevi respondojn. Unu el la ĝeneralaj kunvenoj ĉiam pritraktas la raporton de la Estraro por la antaŭa jaro. Kvankam la Komitato estas kompetenta por fari decidon pri la Estrara Raporto, tamen la pritrakto en ĝenerala kunveno estas taŭga kadro, en kiu esprimiĝas la opinioj kaj vidpunktoj de la membraro. Se dum iu kongreso ampleksa problemo estas traktata en du aŭ pluraj sekcioj, ĉiu kongresano — tute egale ĉu membro de UEA aŭ ne — rajtas ĉeesti, paroli kaj partopreni per voĉdono en la decido, kiu estas rigardata, depende de la karaktero de la pritraktita demando, kiel fina decido, aŭ kiel rekomendo al iu kompetenta organo de la Asocio, kutime la Komitato. UEA disponigas al la aliĝintaj FA kaj aliaj specialigitaj organizaĵoj senpagajn ejojn dum la UK kaj tiamaniere favoras diskutojn pri apartaj demandoj, interesantaj la koncernajn grupojn.

Ĝis 1955 la kunsidoj de la Komitato ne estis publikaj. Ekde tiu jaro ili fariĝis publikaj, kio signifas, ke ĉiu membro de la Asocio povas ĉeesti kaj sekvi la laboron de la supera instanco de UEA. Ankaŭ la aliaj kongresanoj havas la saman rajton. La publikeco de la

kunsidoj estas faktoro de publika kontrolo kaj, kiel tia, plia elemento de demokrateco.

Alia kadro, konscie kreita por pritrakti aktualajn demandojn de la Asocio kaj ĝenerale de la Esperanto-Movado, estas la t.n. debatoj, enkondukitaj en 1969. La unua tiaspeca debato okazis dum la UK en Helsinki (1969). La temo estis „Esperanto — Ĉu Ideologia aŭ Praktika Instrumento?". La dua debato okazis dum la UK en Vieno (1970) kaj la temo estis „Generacia Konflikto — Ĉu Realaĵo aŭ Preteksto?" Dum la tria debato (UK Londono, 1971) estis pritraktita la demando „Neŭtraleco de UEA — Ĉu la Nuna Laŭstatuta Koncepto Estas Adekvata?". La lasta debato okazis dum la UK en Portland kaj la temo estis „La Valoro de Fremdlingva Instruado en la Lernejoj". La celo de tiu nova aranĝo estas aktivigi kiel eble plej multajn kongresanojn en solvado de problemoj, kiujn frontas la Asocio.

Aliajn kadrojn por diskutoj prezentas la kunvenoj de delegitoj, de reprezentantoj de informaj fakoj kaj similaj aranĝoj, organizataj ĉu regule, ĉu sporade, depende de la konstanteco aŭ provizora aktualeco de la traktota demando.

Tiuj konscie kreitaj novaj kadroj, celantaj vastigi la eblecojn esprimi pensojn kaj interŝanĝi opiniojn, certe kontribuis al pli bona kono de faktoj kaj al formiĝo de komunaj vidpunktoj. Alia afero estas, ke ankaŭ tiuj demokrataj institucioj ne estas plene utiligataj. Ankaŭ pri tio ne kulpas la demokrateco de UEA, kiel kelkaj ignorantoj de faktoj pensas kaj plurfoje klopodis kredigi, sed neinteresiĝo kaj inerteco.

Por la glata funkciado de la menciitaj kaj aliaj demokrataj institucioj, kaj sekve por la prosperado de UEA, multe pli gravas libervole akceptita memdisciplino, ol ĉiuj ajn formalaj garantioj de la Statuto kaj Regularoj celantaj sinprotekton kontraŭ eraroj kaj mispaŝoj. Eĉ la plej demokrata Statuto kaj la plej bonaj Regularoj kun kompletigitaj detaloj ne povas per si mem manifesti sian fruktodonan efikecon, se forestas bonvolo kaj sincera deziro agi konkorde por realigi la celojn konforme al la litero kaj, eĉ pli, al la tuta spirito de la bazaj organizaj dokumentoj. Alivorte, sen memdisciplino kiel esenca komplemento de demokrateco, neniu demokrata organizaĵo povas ekzisti. Pri tio plurfoje atentigis jam Zamenhof. Ekzemple, en sia fama adiaŭa parolado dum la Oka UK (1912) preskaŭ testamente li diris:

> Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo. Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan esperantan aferon, kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj

egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto.

Hector Hodler, la fondinto de UEA, same tiel plurfoje admonis pri la neceso de interna disciplino, kiu, finfine, estas nenio alia ol respekto de libervole akceptitaj respondecoj kaj devoj (Art. 9 de la Statuto) kiel kontraŭpezo por la rajtoj sur la pesilo de demokrateco. En UEA la kontraŭpezo preskaŭ ĉiam estis tiel malgranda, ke la pesilo nur escepte, kutime okaze de grandaj kampanjoj, troviĝis en ekvilibro. Al la malekvilibro kontribuis distordoj, kelkfoje tute konsciaj, kiuj celis komplete deformi la demokratan sencon de la principo de memdisciplino. Ĝi estis kaj verŝajne plu estos misprezentata ĝis nerekono. Oni ne hezitis aperte identigi ĝin kun ia armea, serĝenta-kaporala disciplino, kvazaŭ Zamenhof, aŭ kiu ajn alia pledanto por memdisciplino, estus kiam ajn favorinta tian armean disciplinon en UEA, kaj kvazaŭ ĝi entute estus ebla en kultura libervola organizaĵo, eĉ se iu fakte venus al la freneza ideo deziri ĝin. Troviĝis eĉ unuopuloj kaj grupetoj, kiuj aŭdacis misfamigi tiun konsistan elementon de demokrateco ligante ĝin al abomene antipatiaj esprimoj kiel „diktatoreco", „kulto de personeco" k.s. absurdaĵoj, ĉio kun la celo semi malkonkordon kaj malfidon. Ĝuste tial necesis reveni al la afero de tempo al tempo por precizigi la sencon de memdisciplino kaj por doni al la tuta demando de demokrateco en UEA la ĝustan proporcion.

Okaze de la 50-a datreveno de la fondiĝo de UEA, dum solenaĵo en la kadro de la 43-a UK en Mainz, la tiama ĝenerala sekretario kaj nuna prezidanto de UEA, parolante pri „La Rolo de UEA en la Estonteco", denove pritraktis ankaŭ tiun demandon kaj konkludis:

> Se ni estas unuecaj, kvankam ne tre multnombraj, ni povas altrudi nian starpunkton al la mondo. Ni bezonas ankoraŭ pli grandan unuecon de konvinko pri la ĝusteco de nia vojo, unuecon de agado sur tiu ĝusta vojo, unuecon en la observado de la faritaj decidoj. Tio ne signifas, ke ĉiuj devas havi la saman opinion. Male, tio signifas, ke ĉiu el ni libere diru sian opinion pri la metodoj aplikotaj, ke ni vaste kaj profunde diskutu, eĉ longe diskutu, ĉiujn aspektojn de nia agado, sed post tiuj diskutoj kaj post kiam ni faras laŭ plej demokrata vojo decidojn, ni ĉiuj observu ilin kaj per ĉiuj niaj fortoj helpu la realigon. Nur tiamaniere ni iros antaŭen. Nur tio estas la vera senco de nia interna demokrateco, kiu ne estas imagebla sen memdisciplino. Movado militanta kiel la nia, movado militanta sur la kultura kampo, povas progresi ne per sterilaj disputoj, sed per grandaj fortostreĉoj por plenumi demokrate voĉdonitajn decidojn, kiuj samtempe signifas libervole akceptitajn sindevigojn.

Efektive, demokrateco tutsimple ne povas vivi sen minimuma socia disciplino. Foresto de elementa disciplino en internaciaj rilatoj kondukas al anarkio, terorismo kaj agreso. En politikaj demokratioj malobservo de elementa socia disciplino kondukas al detruo de demokrataj institucioj kaj establo de totaleca diktaturo. Kutime, tiujn sekvojn nek antaŭvidas, nek deziras la sendisciplinaj minoritatoj, kvankam ili povus lerni el la eventoplena moderna historio, en kiu abundas ekzemploj kun tiaj tragikaj sekvoj. Eĉ la plej demokrataj konstituciaj garantioj kaj leĝaj preskriboj ne povas malhelpi la procezon de malintegriĝo kaj la finan pereon de demokratio. En sociaj-kulturaj organizaĵoj foresto de memdisciplino kaŭzas formortadon kaj malaperon.

En UEA, ĝuste pro ĝia alta grado de demokrateco en la prezentitaj kondiĉoj de granda heterogeneco de la membraro, malobservo de almenaŭ minimuma memdisciplino kaj de la implicita lojaleco certe kondukus en la abismon de disfalo, se la malbono ne estus ĝustatempe haltigita. Feliĉe por UEA kaj por ĝia estonteco la komuna prudento, almenaŭ ĝis nun, ĉiam fine venkis: la demokrataj institucioj de la Asocio, inkluzive racian memdisciplinon, sukcesis superregi en la decidaj momentoj la ekscesojn de sendisciplinaj malobservoj de demokrateco [14].

La demokrata aparato de UEA funkcias en la kadro de la pritraktitaj bazaj konceptoj, kiel ankaŭ de la celoj kaj rimedoj, kiuj determinas ĝiajn limojn.

18.2.5 Celoj kaj Rimedoj

Antaŭ la amendoj de 1956 la Statuto de UEA neniam faris distingon inter la celoj kaj rimedoj. Nur okaze de la lasta revizio, voĉdonita en decembro 1956, aldone al kelkaj aliaj malgrandaj ŝanĝoj, ankaŭ Art. 3 de la Statuto estis reformulita por reliefigi la celojn disde la rimedoj.

Laŭ la nun valida Statuto (Art. 3) la Asocio havas du fundamentajn celojn: (i) disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto; (ii) plifaciligi ĉiaspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo.

14. La malobservo de grava unuanima decido de la Komitato rilate ŝanĝojn en la Statuto (farita dum la UK en Haarlem, 1954) fare de 3 tiamaj estraranoj estas menciinda ekzemplo de ago kontraŭa al la demokrata postulato de memdisciplino. Ĝi estas ankaŭ ekzemplo de firma sinteno de la Komitato, kiu en tiu decida momento sciis montri sian aŭtoritaton kaj per granda plimulto esprimis malkonfidon al la 3 estraranoj pro tiu ago. V. ankaŭ sube en 18.3.

18.2 BAZAJ KONCEPTOJ

La antaŭviditaj rimedoj por atingi tiujn celojn estas jenaj agadoj: (i) kreskigi inter la membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por la aliaj popoloj; (ii) zorgi pri la kunagado de Esperanto-organizaĵoj; (iii) krei internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limojn de ilia nacia, etna aŭ lingva teritorio; (iv) okazigi la universalajn Esperanto-Kongresojn kaj aliajn internaciajn kongresojn kaj konferencojn; (v) apliki aliajn jure permesitajn rimedojn, kiuj alproksimigas la celojn de la Asocio.

La rimedoj de (i) ĝis (iv) estas eksplicitaj, sed la elasta „aliaj jure permesitaj rimedoj" ebligas apliki kiun ajn rimedon, kiu helpas la atingon de la celoj, kondiĉe ke ĝi ne estu kontraŭa al la juraj ordoj en la ŝtatoj, sur kies teritorioj etendiĝas la agado de UEA, unuavice en la lando de ĝia sidejo. Ekzemple, UEA ne povas kontraŭleĝe havigi kotizojn aŭ pagigi ŝuldojn el unuopaj landoj malobservante iliajn devizajn kaj valutajn preskribojn, aŭ klopodante elmanipuli ilin, sed ĝi sendube rajtas ekspluati tiucele la permesajn klaŭzojn en la koncernaj leĝoj.

Al la jure permesitaj rimedoj apartenas ne nur la jam tradiciaj, ekzemple la praktikaj servoj pere de la delegita reto aŭ la okazigo de universalaj kongresoj, sed ankaŭ tre granda nombro da aliaj, iniciatitaj kaj realigitaj en la nuna periodo: efektive ĉiuj agadoj de la Asocio, koncize prezentitaj sube en 18.5. Ĉi tie estu nur supraĵe menciitaj la pli ol 20-jara laboro de CED; la reorganizo kaj evoluigo de la Informa Fako de UEA; la internacia kaj kongresa gazetaraj servoj, la artikola kaj eltondaĵa servoj; la artaj festivaloj, belartaj kaj oratoraj konkursoj, kaj aktivado sur la eldona kampo; la instituciigo kaj seninterrompa funkciado de ISU; diversaj aktivadoj en la sfero de instruado (ekz. Konstanta Komisiono pri Lernejoj, Internacia Ekzameno, Kontrolkomisiono de Lernolibroj, k.a.); koresponda, lingva kaj magnetofona servoj; grandaj kampanjoj en ligo kun la Peticio al Unesko, Propono al UN, Zamenhof-Jaro, Jaro de Homaj Rajtoj, kaj en pluraj aliaj kazoj; prestiĝaj rilatoj kun Unesko kaj multnombraj kontaktoj kun aliaj interŝtataj kaj privataj organizaĵoj.

La rimedoj estas funkcio de la celoj. Tial, kvankam distingendaj, la du formas unu tuton: la celoj ne povas esti realigitaj sen apliko de taŭgaj rimedoj; la rimedoj estas senefikaj, se ili ne estas direktitaj al la realigo de la celoj. En konstitucia akto de kiu ajn organizaĵo la celoj kaj rimedoj estas la plej esenca parto: oni formas ian organizaĵon por atingi per komunaj fortoj difinitajn celojn, aplikante difinitajn rimedojn laŭ interkonsentitaj metodoj. Tial, kiu ajn konstitucia akto de privata organizaĵo havas karakteron de siaspeca kontrakto, kaj ĝuste tial ĝi estas deviga por la membroj.

Evidente, nur personoj aprobantaj la celojn kaj rimedojn aliĝas al la organizaĵo aŭ, se ili deziras ĉesigi sian apogon, povas eksiĝi. Sed dum ili estas membroj, la koncerna konstitucia akto estas egale deviga por ĉiuj. Tio necese postulas memvolan rezignon de absoluta agadlibereco, ĉar ĉia ajn organiziĝo aŭtomate limigas ĝin per la kadro de la celoj, rimedoj kaj aliaj reguloj de la koncerna akto. Same evidente, personoj ne povantaj laŭ sia karaktero akcepti tian libervolan memdisciplinon, tute ne estas maturaj por organiziĝi.

La Statuto de UEA estas tia konstitucia akto. En ĝia Art. 9 estas eksplicite dirite: „Tiu ĉi Statuto kaj la Regularoj estas devigaj por ĉiuj aliĝintaj organizaĵoj kaj membroj". Ĉiu kolektiva kaj individua membro per sia aliĝo libervole akceptas la elementan devon observi la Statuton, kiel ankaŭ la diversajn regularojn, programojn, planojn kaj ĉiujn decidojn, faritajn konforme al la Statuto. Devojiĝoj, kompreneble, povas okazi. Plej ofte ilin kaŭzas hazardaj malatentoj, aŭ nesufiĉa kono de la reguloj. La interna demokrata aparato de UEA ebligas eviti tiaspecajn erarojn aŭ korekti la jam faritajn sen grandaj malfacilaĵoj. En ekstremaj kazoj, se vere temas pri obstina agado kontraŭa al la celoj de la Asocio aŭ pri kruda malobservado de la ceteraj principoj kaj preskriboj de la Statuto, la kompetentaj organoj devas apliki ekstreman rimedon, nome eksigon el la Asocio. Art. 20 de la Statuto preskribas tiurilate: „Membro aŭ organizaĵo, kiu evidente kontraŭlaboras la celojn de UEA, aŭ ne kontentige plenumas siajn devojn al UEA, povas esti eksigita el la Asocio". La Estraro estas kompetenta pri la eksigo de la individuaj membroj, kaj la Komitato pri la eksigo de organizaĵoj aŭ komitatanoj de la Asocio. Tio povas okazi nur post esploro laŭ la kondiĉoj en la Ĝenerala Regularo. Laŭ Art. 27 de la Ĝenerala Regularo, individua membro aŭ organizaĵo devas esti informita pri la plendo per registrita letero. La koncerna individua membro aŭ organizaĵo rajtas sendi sian defendon en tempolimo de 30 tagoj post la ricevo de tiu sciigo. La Estraro aŭ Komitato, depende de la kompetenteco, povas nomi specialan sendependan komisionon por esplori la aferon. Kontraŭ la decido de la Estraro la interesita membro rajtas apelaciii al la Komitato plej malfrue la tridekan tagon post la ricevo de la decido. La decido de la Komitato — tute egale ĉu ĝi agas kiel la sola instanco en la kazo de organizaĵoj, aŭ kiel dua instanco en kazo de apelacio kontraŭ la decido de la Estraro — estas definitiva [15].

15. En la tuta postmilita historio de UEA estis nur unu kazo de eksigo el la Asocio. Jam antaŭ la UK en Kopenhago (1956) la tiama Komitato eksigis per 22 voĉoj kontraŭ 6 kaj 5 sindetenoj s-ron G. A. Connor, ĝeneralan sekretarion de EANA kaj komitatanon, pro liaj publikaĵoj en *Amerika Esperantisto* kaj pamfletoj, per kiuj li konscie kaj mal-

Simila proceduro estas antaŭvidita por eksigo el ofico. Laŭ Art. 25 de la Ĝenerala Regularo, membroj, kiuj malbone plenumis oficon al ili konfiditan de la Asocio, povas en urĝaj kazoj esti haltigitaj en siaj funkcioj per decido de la direktoro de la C.O. Pri revoko el la ofico estas kompetentaj la direktoro en kazo de oficistoj kaj helpantoj en la C.O.; la prezidanto en kazo de delegitoj; la tuta Estraro en kazo de pli altaj funkciuloj. En ĉiuj kazoj de eksigo el la ofico la eksigito rajtas apelacii en tempolimo de 30 tagoj post la ricevo de la decido: al la Komitato, se estis kompetenta la Estraro, kaj al la Estraro en ĉiuj aliaj kazoj. Ekde 1948 ne estis unusola kazo de eksigo el ofico.

Kiel vidiĝas, ankaŭ la proceduroj por eksigo el la Asocio aŭ el ofico estas bazitaj sur la demokrataj principoj de atenta ekzamenado de la afero, rajto de defendo garantiita al la koncernatoj, kaj kolektiva decidado.

bonintence agis kontraŭ la celoj de la Asocio kaj kontraŭ ĝia neŭtraleco (Art. 3 kaj 4 de la Statuto). Dum la kunsidoj de la nova Komitato en Kopenhago evidentiĝis, ke pluraj el la komitatanoj, kiuj voĉdonis kontraŭ la eksigo aŭ sin detenis, faris tion ne ĉar ili aprobis la agadon de s-ro Connor, sed ĉar ili opiniis, ke la proceduro de la eksigo ne estis tute korekta. En la nova Komitato, jus elektita, la afero estis detale rediskutita, trastudita kaj klarigita, post kio la nova Komitato konfirmis la decidon de la malnova per jena rezolucio, proponita de komitatano P. Petit:

„1. Ĉar la Estraro estas elektita de la Komitato kaj respondeca al ĝi, la Estraro ne povas eksigi el la Asocio iun komitatanon. Tial la Estraro prave transdonis la aferon al la Komitato kiel supera organo de UEA.

2. Studinte la aktojn pri la eksigo, la Komitato decidis konforme al la Statuto. En la proceduro sekve ne estis ia manko.

3. Laŭ la Statuto la decido de la Komitato estas definitiva.

4. La Komitato malakceptas la proponon de D-ro Solzbacher nuligi la decidon, sed konfirmas la eksigon". Tiu teksto estis akceptita per 24 voĉoj kontraŭ 2 kaj 2 sindetenoj. (La Estraro ne voĉdonis.)

En ligo kun tiu ĉi afero la Komitato akceptis per 26 voĉoj kaj 2 sindetenoj (la Estraro ne voĉdonis) rezolucion proponitan de komitatano E. Dahl. Laŭ tiu rezolucio, la Komitato konstatis, „ke la Estraro de UEA en sia laboro por Esperanto kaj por la Asocio rigore observis la principon de absoluta neŭtraleco...." Plue, ĝi deklaris „sian indignon pro la atakoj, insultoj, misprezentoj, kalumnioj kaj fiaj karikaturoj aperintaj en *Amerika Esperantisto* rilate UEA, ĝiajn gvidajn instancojn kaj speciale ĝian ĝeneralan sekretarion, al kiu la Komitato esprimas siajn simpation kaj solidarecon".

Pro la fakto ke s-ro G. A. Connor estis ĝenerala sekretario de EANA kaj ke la tiujara kongreso de EANA en Detroit (Usono) per sia rezolucio esprimis fidon al s-ro Connor, laŭdis lian subfosan agadon kaj kuraĝigis lin daŭrigi, la Komitato opiniis, ke ne plu ekzistas alia elirvojo ol eksigi EANA el UEA. Ĝi akceptis proponon fa-

18.2.6 Sintezo de Kontrastoj

Ĉiu el la priparolitaj principoj estas per si mem sintezo de kontrastoj, kontraŭaĵoj, aŭ eĉ de antagonismaj tendencoj: humanisma internaciismo troviĝas meze de naciismo kaj universalismo; aktiva neŭtraleco solvas la antagonisman konflikton inter pasiva, indiferenta neŭtralismo kaj ekstrema partipolitikismo; demokrateco kun memdisciplino okupas centran pozicion de pozitivo kontraŭ ambaŭ inter si konfliktantaj tezo kaj antitezo de anarkio kaj diktaturo, k.s. rilate la aliajn.

Prenitaj pare, kiel analizite supre, ĉiu el la duopoj prezentiĝas kiel tuto, en kiu la kontraŭstarantaj flankoj kompletigas kaj samtempe limigas unu la alian, kaj per sia kontrasta kunekzisto formas unuecan bazan koncepton.

La bazaj konceptoj kune, en ekvilibra sintezo de kompleksaj interagoj estas la firma fundamento, sur kiu estas konstruita la moderna Universala Esperanto-Asocio.

18.3 ORGANIZAJ DEMANDOJ

18.3.1 Reformoj de 1954-1956

Ekde 1948 UEA fariĝadis ĉiam pli aktiva en pluraj direktoj, precipe sur la kampoj de eksteraj rilatoj (Unesko k.a.), evoluigo de la universalaj kongresoj, esploro kaj dokumentado (CED), organizo de informado, sistemigo de la delegita reto kaj kulturaj iniciatoj.

ritan de komitatanoj V. Setälä kaj C. Støp-Bowitz eksigi EANA laŭ la proceduro antaŭvidita en Art. 27 de la Ĝenerala Regularo. Tiu propono estis akceptita per 26 voĉoj kontraŭ 1 kaj 1 sindeteno. La Komitato samtempe esprimis bedaŭron pro la fakto, ke ĝi sentas sin devigita fari tiun decidon, ĉar ĝi „estas konvinkita, ke el 600 membroj de EANA nur tre malmultaj efektive aprobas la agadon kaj publikaĵojn de s-ro Connor". La iniciatita proceduro ne estis kompletigita, ĉar EANA mem eksiĝis el UEA. EANA daŭrigis ankoraŭ kelkan tempon sian subfosan agadon, precipe en Usono mem, sed poste ĝi komplete malaktiviĝis kaj ekzistis nur surpapere. Paralele, la novaliĝinta landa asocio, ELNA, akceptita de la Komitato en 1955, sukcesis kolekti en siaj vicoj ĉiujn pozitivajn fortojn en Usono, malgraŭ la atakoj kaj eĉ denuncoj de s-ro G. A. Connor kontraŭ ĝiaj gvidantoj. La krono de ĝia ĝisnuna aktivado estis la organizo de la UK en Portland (1972), kiu, kvankam iom pli malgranda ol kutime, tamen estis tre sukcesa. La okazigo de universala kongreso en Usono tre kredeble havos utilajn sekvojn por la plua disvastigo de la Internacia Lingvo en tiu lando.

Montriĝis, ke la Statuto de 1948 kelkrilate ne plu taŭgis en la nova situacio kaj ke necesus adapti ĝin al la aktualaj bezonoj de la Asocio. Dum la regula printempa kunsido de la Estraro de printempo, 1954, la prezidanto, E. Malmgren, aparte emfazis du punktojn, kiuj postulis ŝanĝojn.

La unua rilatis al la funkcio kaj taskoj de la ĝenerala sekretario, kiu laŭ la Statuto de 1948, tiam valida, estis la ĉefo de la Centra Oficejo (CO) kaj okupiĝis pri la tuta teknika administrado. Estis klare, ke la ĝenerala sekretario kun tia funkcia karaktero ne povas zorgi pri la gvidado de la CO kaj administrado de la Asocio, kaj samtempe okupiĝi ankaŭ pri la disvolviĝintaj eksteraj rilatoj kaj la ampleksaj taskoj de efika informado. Tial necesis dividi la du grupojn de taskoj kun esence malsama karaktero, kiuj tial ankaŭ postulis du respondeculojn en malsamaj pozicioj, kun talentoj kaj kvalifikoj konformaj al la karaktero de la taskoj. La propono estis, ke la ĉefo de la CO estontece havu la titolon „administranto" (kun respondecoj de *„secretary"* laŭ la brita juro) kaj prizorgu la tutan teknikan administradon de la Asocio, kaj ke en la Estraro mem troviĝu funkciulo kun la titolo „ĝenerala sekretario", kies ĉefaj taskoj estu la eksteraj rilatoj de la Asocio kaj la monda informado. La Estraro akceptis tiun proponon per 5 voĉoj kontraŭ 2 [16].

La dua punkto koncernis kompenson por la elspezoj de la estraranoj. Tiu demando fariĝis aktuala pro la ampleksiĝintaj taskoj kaj la kunligitaj vojaĝaj kaj aliaj elspezoj de unuopaj estraranoj, precipe de la plej multe ŝarĝitaj. La Statuto de 1948 antaŭvidis, ke „por la administraj kaj vojaĝaj elspezoj de siaj membroj la Estraro rajtas fiksi modestajn kompensojn". La interpreto de tiu regulo kaŭzis kelkfoje malfacilaĵojn, precipe tial, ĉar la Estraro mem devis fari la decidon kaj poste pravigi ĝin antaŭ la Komitato, kvankam ĉiam temis pri pli ol modestaj, minimumaj elspezoj, sen kiuj difinitaj taskoj ne povus esti plenumitaj. Por eviti eblajn misprezentojn de kia ajn speco en la estonteco, necesis precizigi la regulon konforme al la fakta praktiko kaj, krome, transdoni la decidpovon al la Komitato. La propono tekstis: „Por kovri la administrajn kaj vojaĝajn elspezojn de la estraranoj la Komitato asignas certan sumon en la buĝeto". La propono enhavis plian regulon, laŭ kiu la Komitato rajtos asigni al komitatano kompenson „por speciala tasko, kies plenumo postulas grandan tempoperdon". La Estraro akceptis tiun proponon per ĉiuj voĉoj kontraŭ 1 (Oliver).

16. En tiu tempo E. Malmgren estis prezidanto, D. Kennedy vicprezidanto, J. Guillaume, H. Jakob, D-ro P. Kempeneers, Prof. D-ro I. Lapenna kaj A. C. Oliver estraranoj. Kontraŭ la propono voĉdonis H. Jakob kaj A. C. Oliver.

18 KONSTRUADO DE MODERNA UEA (1948-1973)

Post tuttaga diskuto pri la menciitaj kaj aliaj ŝanĝproponoj de la prezidanto kun diversaj amendoj de unuopaj estraranoj, la Estraro difinis projektojn de novaj Statuto, Ĝenerala Regularo kaj Kongresa Regularo. La ĝenerala sekretario (ĉefo de la CO) ricevis la taskon pretigi la tekstojn por prezento de la projektoj al la Komitato.

En majo 1954 la prezidanto komunikis la aprobitajn tekstojn al la Komitato. Li atentigis pri la du esencaj ŝanĝoj kaj pri la ĉefa celo de la reformo: konservi en la Statuto la fundamentajn principojn kaj transigi la detalojn kaj precizigojn en la Ĝeneralan kaj Kongresan Regularojn, kiuj estas pli facile ŝanĝeblaj kaj daŭre adapteblaj al la ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj, en kiuj la Asocio agas. Por faciligi la laboron de la Komitato dum la UK en Haarlem (1954), la prezidanto petis la komitatanojn sendi al li ĝis la 15-a de junio siajn eventualajn rimarkojn kaj proponojn, tiel ke li povu jam antaŭ la kunsido kompili dokumenton, prezentotan al aparta komisiono, kiun la Komitato elektos por trastudo de la problemo.

La tuta demando estis detale pridiskutita en la Komitato dum la UK en Haarlem: unue en aparta komisiono kaj poste en la pleno sub prezido de la vicprezidanto, D. Kennedy, ĉar la prezidanto pro malsano ne povis ĉeesti. La komisiono faris malgrandajn ŝanĝojn en la projektoj de la Statuto kaj la du Regularoj, precipe rilate vortumon, kaj rekomendis al la Komitato akcepti la amenditajn tekstojn.

En la plena kunsido de la Komitato de la 4-a de aŭgusto 1954 la Komitato ĉiuvoĉe decidis okazigi ĝeneralan voĉdonon konforme al Art. 41 de la Statuto kaj rekomendi al la aliĝintaj LA kaj al individuaj membroj en landoj sen aliĝinta asocio aprobi la novan Statuton (komitatano A. G. Connor sin detenis kaj komitatano A. C. Oliver aprobis kun rezervo rilate la novan Art. 30 en la parto pri la funkcio de la ĝenerala sekretario). La Komitato ĉiuvoĉe decidis, ke en la ĝenerala voĉdono oni voĉdonu por aŭ kontraŭ la Statuto kiel tuto.

Dum la sama kunsido la Komitato aprobis diversajn ŝanĝojn en la Ĝenerala Regularo per ĉiuj voĉoj kontraŭ 1, kaj en la Kongresa Regularo ĉiuvoĉe. En la kunsido de la antaŭa tago la Komitato decidis ĉiuvoĉe (inkluzive la telefonan konsenton de la prezidanto), ke la sama Estraro, elektita en Zagreb (1953) funkciu ankoraŭ unu jaron kaj agu laŭ la tiam valida Statuto ĝis la aprobo de la nova, se tio fakte okazos; se la nova Statuto estos aprobita, oni tuj poste elektu novan Komitaton, kiu dum la UK en Bolonjo (1955) elektu novan Estraron. S-ro C. C. Goldsmith, kiu jam pli frue anoncis al la Estraro sian decidon emeritiĝi la 16-an de novembro 1954, kiam li atingos

la aĝon de 65 jaroj, estis elektita Honora Membro.

Plenumante tiujn decidojn la Estraro tuj entreprenis la necesajn paŝojn por okazigi ĝeneralan voĉdonadon. Ĝi komisiis la ĝeneralan sekretarion sendi al la voĉdonontoj la akceptitan tekston de la Statuto kun la rekomendo de la Komitato aprobi ĝin. Tiusence estis eĉ ellaborita malneto de akompana rekomenda cirkulero al la aliĝintaj LA kaj individuaj membroj. Hans Jakob, la tiama redaktoro de *Esperanto* kaj estrarano, skribis en la septembra ĉefartikolo, verkita verŝajne en Haarlem mem:

> Novaranĝo de la Statuto — tiu ĉi zorginfano de la gvidantaj povoj de UEA — fine trovis sian solvon: kompromiso en principaj demandoj estis atingita. Post kiam akceptos ĝin la landaj asocioj [17], ni povos iri sur nova vojo al novaj sukcesoj kaj iam atingi la celon.

Bedaŭrinde, pro nekompreneblaj motivoj — ĉar absolute neniu nova elemento intervenis post la ĉiuvoĉaj decidoj en Haarlem — tri estraranoj (Jakob, D-ro Kempeneers kaj Oliver) sendis cirkuleron al la voĉdonontoj en la ĝenerala voĉdonado, en kiu ili forte malaprobis la ŝanĝojn en la Statuto, ĵus aprobitajn de la Komitato, kaj instigis malakcepti ilin. Per tio la tri estraranoj agis kontraŭ la decidoj de la Komitato, por kiuj ili mem voĉdonis. La ago estis des pli bedaŭrinda, ĉar ĝi venis tute neatendite, en periodo de plej intensaj, decide gravaj finpreparoj por efike reprezenti la Asocion en Montevideo dum la Ĝenerala Konferenco de Unesko.

En tiaj kondiĉoj la prezidanto sentis sin devigita prezenti la aferon al la Komitato, kiu komence de 1955 per granda plimulto malaprobis la agmanieron de la tri estraranoj kaj esprimis al ili malkonfidon. Estraranoj D-ro Kempeneers kaj Oliver eksiĝis el la Estraro jam antaŭ la publikigo de la rezulto de la voĉdonoj. H. Jakob bedaŭris sian misagon kelkajn monatojn poste [18].

17. Verŝajne hazarde estas ellasitaj la individuaj membroj en la landoj sen aliĝinta asocio.

18. Pri tiu incidento raportis H. Jakob mem en la maja numero de *Esperanto*, 1955, kaj komunikis jenan deklaron: „La Estraro de UEA, kunveninte la 19/20-an de marto 1955, diskutis la voĉdonon pri malkonfido flanke de la Komitato al la tri protestintoj, s-ro Hans Jakob, D-ro Kempeneers kaj s-ro A. C. Oliver. S-ro Jakob klarigis la motivojn, kiuj igis lin malkonfirmi sian propran voĉdonon en Haarlem favore de la nova Statuto. La Estraro kompreneme aŭdis la motivojn, kvankam ne aprobante la procedon. Laŭ la deklaroj de s-ro Hans Jakob vidiĝas lia deziro kontribui je forigo de efiko de lia kontraŭstaro, en la intereso de la Asocio kaj de nia afero entute. La Estraro unuanime rekomendas al la Komitato, ke s-ro Hans Jakob restu, kune

Intertempe la malbono jam estis farita. En la januara numero de *Esperanto*, 1955 — la sama, en kiu sur la unuaj paĝoj aperis informoj pri la brilaj sukcesoj en Montevideo (Rezolucio de la 10-a de decembro, 1954, kaj konsultaj rilatoj) — sur la lasta paĝo estis publikigitaj la rezultoj de la ĝenerala voĉdono. Por la propono estis entute donitaj 11.262 voĉoj; kontraŭ la propono entute 4.412 voĉoj. Ĉar la favoraj voĉoj ne atingis tri kvaronojn de la esprimitaj voĉoj (entute 15.674), la propono pri la nova Statuto ne estis akceptita [19].

En januaro, 1955, komitatano J. Strönne, apogita de 8 aliaj komitatanoj prezentis novan proponon, kiu iom ŝanĝis la aŭgustan projekton, ĵus malakceptitan. Tiun novan projekton, kune kun la amendoj de komitatano I. Lapenna al Art. 27 kaj 29, la Komitato akceptis per granda plimulto. Ĝi ankaŭ decidis per 24 voĉoj kontraŭ 2 kaj 2 sindetenoj (la aliaj ne voĉdonis) okazigi ĝeneralan voĉdonadon, en kiu oni voĉdonos ne bloke, sed por ĉiu unuopa artikolo. La nova propono estis publikigita en la marta numero de *Esperanto*, 1955, kaj fariĝis konata kiel „marta projekto". Ĝi estis submetita al publika diskuto en la organo de la Asocio, „kondiĉe ke la koncernaj artikoloj estu mallongaj, koncizaj kaj sen personaj atakoj". Ĉi-foje okazis vasta diskuto, en kelkaj landoj — interalie en Britio, kies LA voĉdonis kontraŭ la ŝanĝoj en la antaŭa voĉdono — la lokaj societoj aranĝis tiucele apartajn kunvenojn de la membraro. La voĉdonado finiĝis la 15-an de julio kaj la rezulto estis konata la 16-an de julio 1954, senpere antaŭ la Kongreso en Bolonjo. Entute estis 16.885 validaj voĉoj. Oni voĉdonis por ĉiu unuopa artikolo. La rezultoj variis de minimume 12.082 ĝis maksimume 13.673 por la ŝanĝoj, kaj de 693 ĝis 2.284 kontraŭ la ŝanĝoj, sed ĉiu unuopa artikolo ricevis apogon de minimume tri kvaronoj de la esprimitaj voĉoj, tiel ke la tuta Statuto estis akceptita [20].

Dum la UK en Bolonjo, konforme al la decido de la Komitato en Haarlem, la Komitato elektis novan Estraron. Per sekreta voĉ-

kun la aliaj estraranoj Malmgren, Kennedy, Guillaume kaj D-ro Lapenna, en la Estraro ĝis la Kongreso en Bologna". Li finis la artikolon per la vortoj: „Kaj nun: Antaŭen kun kredo kaj fervoro". Efektive, la Komitato konsentis kaj H. Jakob plu restis membro de la Estraro. Intertempe, dum ceremonieto, okazinta en la CO la 16-an de novembro 1954, la multjara ĝenerala sekretario C. C. Goldsmith (1889-1972) efektive emeritiĝis. Laŭ la decido de la Estraro, John C. Rapley fariĝis la nova ĝenerala sekretario laŭ la tiam valida Statuto, sed provizore por ambaŭ partioj ĝis la Kongreso en Bolonjo.

19. V. detalojn en la januara *Esperanto*, 1955.
20. Detaloj pri la rezulto aperis en la oktobra *Esperanto*, 1955.

dono estis elektitaj E. Malmgren kiel prezidanto, D. Kennedy kiel vicprezidanto, Prof. D-ro I. Lapenna kiel ĝenerala sekretario (la unua laŭ la ĵus akceptita Statuto), P. M. Mabesoone kaj R. Llech-Walter kiel estraranoj. W. Auld estis nomita redaktoro de *Esperanto*, dum H. Jakob estis elektita Honora Redaktoro.

Per akcepto de la nova Statuto ne finiĝis la malfacilaĵoj. Dum la Kongreso en Bolonjo la tiama administranto (laŭ la nova Statuto), John Rapley, esprimis la deziron eksiĝi el sia ofico. Komplete mankis geoficistoj en la CO. Laŭ la raporto de la komisiono por la vendo de la domo en Heronsgate kaj aĉeto de alia domo en Londono (v. sube), montriĝis, ke ne estas eble trovi en mallonga tempo konvenan sidejon de la Asocio en Londono. Aliflanke, evidentiĝis laŭ la informoj de la sama komisiono, ke estas praktike neeble trovi en Britio geoficistojn, kiuj estus pretaj ekloĝi en Heronsgate, aŭ veturi ĉiutage tien el malproksimaj loĝlokoj. La fakto, ke post la 30-a de septembro la CO estis restonta praktike sen geoficistoj, kaŭzis veran administran problemon. Al tiuj malfacilaĵoj aldoniĝis kelkaj pliaj agoj de la malplimulto, kiu ne estis kontenta pro la akceptitaj ŝanĝoj.

En tiaj kondiĉoj la Estraro decidis funkciigi administran oficejon en iu alia lando konforme al Art. 6 de la Statuto, sed la Centra Oficejo en ĉiu okazo devis formale resti en Britio, ĉar por ŝanĝi la sidejon estus necesa nova ĝenerala voĉdonado. En tiu malfacila momento f-ino M. Vermaas, ĝis tiam komitatanino, akceptis transpreni la funkcion de administrantino laŭ la nova Statuto. Ŝia grandega sindono kaj personaj oferoj helpis solvi la krizon. Jam la 19-an de oktobro 1955 ŝi povis anonci al la Komitato, ke la 17-an de tiu monato ŝi transprenis la gvidadon de la CO. F-ino Vermaas ekloĝis provizore en Londono en la hejmo de la ĝenerala sekretario kaj, kune kun li kaj la sekretariino de CED, ĉiutage veturis al la CO en Heronsgate, tiel ke la CO povis seninterrompe funkcii. Helpis kelkaj dumtempaj geoficistoj kaj, libervole, pluraj sindonaj britaj esperantistoj.

Dum tiu streĉa periodo la nova administrantino sukcesis trovi taŭgan oficejon en Rotterdam kaj fari plurajn interkonsentojn kun la estontaj helpantoj en Nederlando.

En la novembra *Esperanto*, 1955, sur la unua paĝo aperis diklitere informo, ke ekde la 15-a de novembro funkcias en Rotterdam la Administra Oficejo de UEA je la adreso Eendrachtsweg 7. La informon akompanis jena konciza komento de la nova ĝenerala sekretario:

Se estas vero, ke la urboj havas ne nur sian fizikan aspekton, sed

ankaŭ sian spiritan fizionomion, tiam la animon de Rotterdam ornamas filozofia saĝo, aŭdaca praktikemo kaj senfina kuraĝo. Medion pli taŭgan kaj konforman al la celoj kaj idealoj de Movado kiel la nia malfacile oni povas imagi. La hazardo eĉ volis, ke la Asocio trovu hejmon precize en la bela kaj fama Eendrachtsweg, kio signifas „strato de konkordo". La spirito de Rotterdam animu nian laboron kaj la nomo de la strato simbolu nian unuecon!

Eĉ la nomo de la strato estis utiligita por ankoraŭfoje kuraĝigi konkordon kaj unuecon!

La translokiĝo okazis tiel glate kaj organizite, ke la membraro apenaŭ estus rimarkinta ĝin sen tiu informo. La 5-an de novembro UEA fermis sian oficejon en Heronsgate kaj la antaŭan tagon estis ekspedita la novembra *Esperanto;* la 15-an de novembro normale ekfunkciis la oficejo en Rotterdam kaj la decembra numero de *Esperanto* aperis normale komence de la monato. En nuraj dek tagoj ĉio estis farita.

Dum la UK en Kopenhago necesis denove konsideri ŝanĝojn en la Statuto, precipe rilate la sidejon de la Asocio, kiu plu formale estis en Britio. Krome, la ŝanĝitaj cirkonstancoj postulis amendojn por konformigi la Statuton al nederlanda juro kaj havigi al UEA sendependan juran personecon.

La projekto de ŝanĝoj, prezentita de la Estraro, trairis la kutiman proceduron: diskuto en la pleno de la Komitato, pritrakto en aparta komisiono, rediskuto kaj akcepto en la Komitato. La ĉefaj ŝanĝoj estis:

En Art. 1 estis aldonita nova alineo, laŭ kiu UEA estas fondita por la periodo de 29 jaroj, kalkulita de la 28-a de aprilo 1947, kaj sekve finiĝonta la 27-an de aprilo 1976. La koncerna nederlanda leĝo postulas tiun formulon. Kompreneble, en 1976 la vivdaŭro de UEA estos longigita por pliaj 29 jaroj. En Art. 6 estis farita pli grava ŝanĝo, ĉefe pro la spertoj de la pasinta jaro, kiam ne estis eble translokigi la sidejon sen ĝenerala voĉdonado. Laŭ la amendo de tiu artikolo, la Komitato povas per du trionoj de la voĉoj de ĉiuj komitatanoj ŝanĝi la landojn kaj lokojn de la ĉefsidejo kaj de la Serva Centro, sed la Estraro plu rajtas funkciigi aliajn oficejojn laŭbezone. En Art. 10 estis aldonita nova alineo pri la Honora Patrona Komitato. En Art. 13 estis farita aldono, laŭ kiu la Komitato rajtas akcepti plurajn landajn asociojn el unu regno. En la tuta Statuto kaj en ĉiuj regularoj la titolo „administranto" estis ŝanĝita al „direktoro" de la CO.

Okazis ankoraŭfoje ĝenerala voĉdonado. La maksimuma voĉnombro estis 21.762. Ĉiu artikolo ricevis pli ol du trionojn de la esprimitaj voĉoj, dum tiu lasta nombro prezentis pli ol la duonon

de la tuta membraro (10.881), kiel postulas Art. 43 de la Statuto.

Per tio finiĝis la granda organiza reformo kaj la Asocio ricevis Statuton konforman al la nuntempaj bezonoj. Ke ĝi estas taŭga, montras ankaŭ la glata funkciado de la Asocio ekde 1956, sen pliaj organizaj diskutoj rilate kiun ajn ĝian regulon. Estas, tamen, utile memori, ke eĉ maksimume perfekta statuto kaj ĝiaj kompletigaj regularoj ne povas antaŭvidi ĉiujn eblajn situaciojn kaj detalojn. Tiujn vakuojn plenigas komuna prudento kaj bonvolo, sen kiuj neniu jura akto povas efike funkcii.

La nova Statuto estis aprobita per Reĝa Dekreto no. 49 de la 22-a de marto 1958 konforme al la nederlanda juro. Per tiu Akto UEA ricevis juran personecon, kio signifas, ke ĝi povas agi kiel tia, en sia propra nomo, havi rajtojn kaj akcepti devojn, aĉeti, vendi, heredi, proprieti ktp.

Estas utile mencii, ke en 1956 okazis ankaŭ la regulaj elektoj de la Komitato, por la unua fojo laŭ la Statuto de 1955. Dum la UK en Kopenhago estis elektita nova Estraro. E. Malmgren, la meritplena prezidanto de UEA ekde 1947, pro tre malbona sanstato decidis ne plu kandidatiĝi por reelekto [21]. La Estraro, elektita en 1956, konsistis el Prof. D-ro G. Canuto kiel prezidanto; P. M. Mabesoone (financoj kaj administrado) kaj H. Holmes, O.B.E., kiel vicprezidantoj; Prof. D-ro I. Lapenna, kiel ĝenerala sekretario (informado, eksteraj rilatoj, planado kaj aliaj taskoj laŭ Art. 30 de la nova Statuto); R. Llech-Walter (kongresoj), D-ro Inĝ. G. Azzi (kulturaj aferoj) kaj D-ro W. Hermann (landaj kaj fakaj asocioj), kiel estraranoj. Ĝi estis la unua Estraro kiu eklaboris laŭ la nun valida Statuto.

Dum la ferma kunsido de la Kongreso E. Malmgren faris sian adiaŭan paroladon. Laŭ la raporto pri tiu evento, publikigita en la septembra *Esperanto*, 1956, li antaŭ ĉio dankis pro la konfido, kiun li ĝuis dum pli ol 20-jara laboro en la Komitato kaj Estraro. Bedaŭrinde, la sanstato nun devigas lin forlasi la postenon. Jen pliaj partetoj el tiu raporto:

> Jam antaŭ 30 jaroj li havis antaŭ la okuloj tiun organizan formon, kiun la Asocio nun atingis kaj li estas tre feliĉa, ke li vidis tiun evoluon kaj povis aktive partopreni ĝin.... Sen la konfido de la membraro tia evoluo ne estus ebla kaj li varme rekomendas doni la saman

21. E. Malmgren (1899-1970) fariĝis estrarano de UEA dum la UK en Stockholm (1934) kaj restis en la Estraro seninterrompe ĝis la retiriĝo en 1956. Ekde 1938 ĝis 1947 li estis vicprezidanto de IEL. En 1962 la Komitato unuanime elektis lin Honora Prezidanto de UEA. Ĝi estas la plej alta honorigo, kiun UEA povas doni, kaj li plene meritis ĝin. Nekrologo aperis en la maja *Esperanto* 1970.

konfidon ankaŭ al la nuna Estraro, kiu ekkonscie daŭrigos la laboron. Kun multaj plej diversnaciaj personoj li kunlaboris kaj kun ili la prezidinto travivis feliĉajn kaj malfacilajn momentojn. Li esprimas koran dankon al ĉiuj kunlaborintoj kaj precipe al S-ro Kennedy, kiu kiel vicprezidanto longe anstataŭis lin siatempe dum lia malsano. Speciale li dankis al siaj pli intimaj kunlaborintoj kaj tute aparte al Prof. Lapenna, kun kiu li havis en la lastaj jaroj preskaŭ seninterrompan kontakton kaj al kiu li deziras forton, sanon kaj energion por daŭrigi la laboron. Li avertas la esperantistan publikon kontraŭ perfidaj disflustroj kaj rekomendas al ĝi ne fidi je ondiroj, sed en tiaj kazoj turni sin al la kompetentaj instancoj por peti informojn. Niaj kontraŭuloj ekster la Movado estas multnombraj. Nur unu eblecon ili havas: subfosi niajn proprajn vicojn, krei malkonkordon inter ni, suspektigi niajn gvidantojn. Se ili sukcesos, ili venkos nin. Se niaj gvidantoj lasos la organizaĵon, ĝi estos kiel granda domo konstruata sen arkitekto, lasita al masonistoj kaj ĉarpentistoj. La prezidinto ripetas la iamajn adiaŭajn vortojn de Generalo Bastien: „Estu toleremaj", kaj li aldonas, ke sen laŭplana agado, sen reciproka subteno, sen forta organizaĵo ĉiu laboro restos vana, sed ke, se la esperantistoj restos solidaraj, nenio povos haltigi la venkon de Esperanto.

Dum tiu ferma kunsido E. Malmgren kaj D. Kennedy, la vicprezidinto, ricevis konvenajn donacojn kaj la plej varman dankon pro sia multjara servado al la Asocio kaj al la Esperanto-Movado entute.

18.3.2 Domo de UEA

Alian, sed multe malpli gravan organizan problemon frontis la Asocio en ligo kun la domo de UEA. Ĝi estis solvata paralele kun la organiza reformo.

La demando de la domo estis la unuan fojon serioze pridiskutita dum la printempa kunsido de la Estraro en 1953. Oni atente pesis la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de sidejo en kamparo, malproksime de grava kultura centro. La tiama ĝenerala sekretario, C. C. Goldsmith, kaj estrarano A. C. Oliver opiniis, ke estas avantaĝo havi la oficejon en Heronsgate, ĉar, pro la malproksimeco de Londono, la laboro ne estas ĝenata de multaj vizitantoj. Aliaj opiniis, ke la relative granda distanco de Londono, kun tre malbonaj komunikoj, estas malavantaĝa. Se la oficejo estus en Londono, ĝi havus pli da kontakto kun la Esperanta vivo, pli facilajn rilatojn kun diversaj aliaj organizaĵoj kaj pli da eblecoj por vizitoj de funkciuloj el aliaj landoj. Krome, konsiderante la kreskantan prestiĝon de UEA, sidejo en Londono kontribuus al altigo de la reputacio de la Asocio. Dum tiu kunsido, la Estraro esprimis la opinion, „ke la nuna stadio de la Esperanto-Movado devigas serioze studi la eblecojn por havigi domon en Londono per vendo de tiu en Heronsgate". D-ro I. Lapenna

kaj A. C. Oliver estis komisiitaj esplori ĉu ekzistas ŝancoj, ke UEA aĉetu domon en Londono kune kun BEA kaj la Londona Esperanto-Klubo. Tio estis farita kaj montriĝis, ke tia ebleco ne ekzistas.

La demando estis denove traktata dum la printempa kunsido de 1954. Dum tiu kunsido estis kontestita eĉ la rajto de UEA vendi la domon. Ĉar UEA ne havis personecon laŭ la brita juro, la domo estis prizorgata de C. C. Goldsmith kaj A. C. Oliver kiel kuratoroj por UEA kaj en ĝia intereso. Ili deklaris, ke siatempe, en 1936, ili promesis al la Konsilantaro de BEA — kun la aprobo de la donacinto de la domo kaj de la tiama prezidanto Generalo Bastien — ke la domo fariĝos proprieto de BEA en kazo de likvido de UEA aŭ la translokigo de ĝia sidejo el Britio. Pri tiu promeso neniu en la Estraro sciis kion ajn pli frue. Necesis eĉ konsulti solicitoron (advokaton), kiu konfirmis la opinion de D-ro I. Lapenna, en tiu tempo ankaŭ estrarano pri juraj aferoj, ke BEA tre verŝajne ne havas ian laŭleĝan rajton je la domo. Tamen, ambaŭ konsilis trovi kun BEA amikan, kompromisan solvon. C. C. Goldsmith kaj A. C. Oliver deklaris, ke ili, kiel kuratoroj, rifuzos subskribi la kontrakton pri la vendo de la domo, se antaŭ tio ne estos trovita interkonsento kun BEA. Dum tiu kunsido la Estraro decidis, ke UEA vendu la domon en Heronsgate kaj aĉetu taŭgan en Londono (H. Jakob kaj A. C. Oliver voĉdonis kontraŭ, D-ro Kempeneers sin detenis). La Estraro elektis komisionon por prizorgi la efektivigon de la decido. Ĝi konsistis el W. A. Gething (prezidanto), C. C. Goldsmith, H. Holmes kaj A. C. Oliver.

Dum la kunsido de la Estraro en Haarlem (1954) montriĝis, ke BEA estus preta rezigni pri ĉiuj eventualaj rajtoj je la domo por la sumo de 250 anglaj pundoj. Tiu propono estis prezentita al la Komitato dum la sama Kongreso, kaj ĝi aprobis la interkonsenton. Sekve, la sumo de 250 pundoj estis pagita al BEA, kaj en la bilanco la valoro de la domo estis altigita de 2.000 al 2.250 pundoj. Montriĝis ankaŭ, ke la menciita komisiono multe klopodis trovi taŭgan domon en Londono, sed ne sukcesis pro la alteco de la prezoj. Efektive, la fakta valoro de la domo en Heronsgate estis inter 3.500 kaj 4.000 pundoj, dum simila domo en Londono, ne en la centro, kostis ĉ. 12.000 pundojn.

Dum la kunsidoj de la Estraro en Bolonjo (1955) estis jam tute klare, ke el la mono ricevota per la vendo de la domo en Heronsgate ne estos eble aĉeti domon en Londono. La Estraro decidis, ke la sumo ricevota per la vendo estu investita en iun renoman konstrusocieton en Britio. H. W. Holmes, la nuna Honora Prezidanto de UEA, kaj Prof. I. Lapenna, la ĵus elektita ĝenerala sekretario, estis komisiitaj prizorgi la negocon kun la konstrusocieto kaj funkcii kiel

administrantoj de la t.n. Londona Konto de UEA, kiun taskon ili plu prizorgas.

Fine, post multaj klopodoj, la domo en Heronsgate estis vendita la 23-an de marto 1956 por la sumo de 4.150 pundoj. La prezo estis tre konvena, des pli, ke la domo, post la fermo de la CO la 5-an de novembro 1955, estis malplena. Antaŭ la subskribo de la kontrakto la vendon aprobis la Komitato per skriba voĉdono fine de 1955. Post la pago de la kostoj de la advokato kaj agento, kiel ankaŭ de diversaj fakturoj en Britio, restis 3.000 pundoj. Tiu sumo estis investita en *Abbey National Building Society* je interezo.

Kiel montrite en 18.3.1, la Oficejo de UEA en Rotterdam troviĝis en luita domo ekde novembro 1955, sed la ideo ĉiam estis aĉeti propran domon. Ekde la komenco oni sciis, ke la domo en Eendrachtsweg devos iam esti malkonstruita, ĉar tiel antaŭvidis la konstruplano de la urbo Rotterdam. Ĝuste tial la luprezo estis malalta. En 1961 oni komencis la malkonstruadon de la apudaj domoj kaj la sama sorto atendis la domon, en kiu troviĝis la oficejo. La Estraro nomis komisionon por trovi novan domon kaj ĝi tuj komencis sian malfacilan taskon. La komisiono, konsistanta el E. J. Woessink, B. C. Storm kaj M. Vermaas, en somero 1961 sukcesis trovi tre taŭgan domon, en bona pozicio en la centro de Rotterdam. Post la aprobo de la Estraro, la 19-an de oktobro 1961 UEA subskribis la kontrakton kaj antaŭ notario okazis la laŭleĝa transdono. Tiamaniere UEA fariĝis proprietulo de la domo en Nieuwe Binnenweg 176 en Rotterdam. La domo kun la korto ampleksas 372 kvadratajn metrojn kaj havas 15 ĉambrojn. La ĉefan meriton por la kontentiga solvo de tiu demando havis la tiama direktorino de la CO, M. Vermaas, kiu mem prizorgis la ampleksan internan rekonstruon de la domo por adapti ĝin al oficejaj bezonoj, kaj la transporton de la oficejo en la novan sidejon.

La elspezoj por la domo, ĝis la 31-a de decembro 1961, inkluzive la kromkostojn de 7.400 gld., estis entute 116.138 guldenoj. Tiu sumo estis pagita el hipoteko (55.000 gld.), el la mono investita en *Abbey National Building Society* kaj per mono el la Garantia Fondaĵo, post vendo de la obligacioj en kanadaj dolaroj. Poste la „vendo" de ĉambroj — nome pago de 5.000 guldenoj por havigi la rajton doni al iu ĉambro difinitan nomon — havigis plian konsiderindan sumon kaj ebligis nuligi la hipotekon (v. ankaŭ sube en 18.6).

Per la aĉeto de la domo en Rotterdam estis kontentige solvita plia organiza demando. Sekvis kampanjo por modernigi la oficejon per novaj maŝinoj kaj alia ilaro. Ankaŭ tiu agado sukcesis. Nuntempe la CO de UEA troviĝas, do, en propra domo kun komfortaj lumaj ĉambroj, kun moderna oficeja ilaro, inkluzive propran kom-

Dekstre: La Centra Oficejo de UEA en Rotterdam troviĝas en la propra 15-ĉambra domo, aĉetita la 19-an de oktobro 1961.



Sube: Detalo el la Domo de UEA en Rotterdam – la Ĉambro Kanado, en kiu troviĝas la Biblioteko Hodler.



postilon kaj la necesan fotoaparataron, kio ebligas produkti la revuon, Jarlibron kaj aliajn presaĵojn konsiderinde pli favore ol antaŭe.

18.3.3 Planado

18.3.3.1 *Komenciĝoj.* — Mallonge post la kunfandiĝo la Estraro komencis sistemigi la laboron per disdivido de la taskoj inter la unuopaj estraranoj laŭ la ĉefaj agadbranĉoj de la Asocio [22], sed tio ankoraŭ ne estis planado en la vera senco de la vorto. La branĉoj ne povis esti firme establitaj, ĉar ĉio troviĝis nur en procezo de komenca organizado, kaj la unuopaj estraranoj estis ŝarĝataj jen pri unu, jen pri alia fako. Ekzemple, en 1951-52 la prezidanto (E. Malmgren) estris la kontaktojn kun la landaj asocioj; la vicprezidanto (D-ro P. Kempeneers) prizorgis la rilatojn kun eksteraj movadoj kaj oficialaj instancoj, sed jam en 1953 tio fariĝis la nuna fako „eksteraj rilatoj" kaj transiris en la kompetentecon de estrarano I. Lapenna, kiu, krome, respondecis pri informado (ekde 1952 ankaŭ pri CED), kongresoj kaj juraj aferoj, inkluzive ĉiujn statutajn demandojn [23]; estrarano D. Kennedy respondecis pri la fakaj asocioj, sed poste la LA kaj FA, kelkfoje ankaŭ la delegita reto, fariĝis unusola branĉo; estrarano H. Jakob prizorgis la eldonaĵojn kaj servojn, kio nun estas inkluzivita en la pli granda branĉo „kulturaj aferoj" kaj, parte, en aliaj branĉoj; estrarano A. C. Oliver estis ŝarĝita pri financoj kaj administrado, sed en la posta evoluo estis kelkfoje utile disigi la du, aŭ denove kunigi ilin.

La kriterio por divido de la agadoj en difinitajn branĉojn estis kaj certe plu estos diktata de la postuloj, kiujn altrudas la konkretaj bezonoj en difinita periodo, kvankam kelkaj el la branĉoj nun jam estas firme establitaj [24]. Aliflanke, necesis preni en konsideron ankaŭ la atenditan kompetentecon de ĉiu unuopa estrarano pro liaj kvalifikoj, interesiĝoj, antaŭa laboro sur kiu ajn nivelo, kaj preteco konscience prizorgi difinitajn plenumendajn taskojn eĉ se li ne ha-

22. V. piednoton 5 en tiu ĉi Ĉap.

23. Ekde la UK en Bolonjo (1955) li prizorgis kiel ĝenerala sekretario, laŭ Art. 30 de la nova Statuto, aldone al la menciitaj branĉoj, ankaŭ la programojn kaj planojn de UEA, sed ekde aŭgusto 1955 la kongresoj kaj konferencoj estis prizorgataj de E. Malmgren ĝis aŭgusto 1956, kiam ili denove transiris en la kompetentecon de la ĝenerala sekretario laŭ la nova Statuto.

24. En la Jarlibro kaj sur la interna kovrilpaĝo de *Esperanto* regule aperas la ĉefaj agadbranĉoj kaj la nomoj de la estraranoj, kiuj respondecas pri ili. Por ekscii la aktualan staton, necesas konsulti la lastajn eldonojn de tiuj periodaĵoj.

vas apartan emon por ili. Ideala solvo, kiun oni devus celi en la estonteco, estus elekti Estraron ne nur kiel eble plej internacian, tiel ke ĝi reflektu la universalecon kaj geografian etendiĝon de UEA, sed ankaŭ maksimume laborkapablan pro la homogeneco rilate la bazajn konceptojn kaj pro la kvalifikoj (fakaj kaj laboraj) de ĉiu unuopa estrarano, ebligantaj al li kompetente gvidi difinitan branĉon konforme al la konkretaj bezonoj, laŭ la principo de kolektiva decidado kaj individua, sendependa realigado.

Paralele kun la divido de la laboro inter la unuopaj estraranoj laŭ la branĉoj, komenciĝis la sistemo de komisiitoj aŭ komisionoj por apartaj taskoj, kaj tiu sistemo estas aplikata ankaŭ nuntempe.

La unua agadprogramo en la vera senco de la vorto estis farita en 1951 okaze de la preparlaboroj por la fondo de CED kun la celo ekfunkciigi ĝin la 1-an de januaro 1952. En la plano estis difinitaj la celoj, taskoj kaj rimedoj de CED kiel institucio por esplorado kaj dokumentado de ĉiuj aspektoj de la lingva problemo en la mondo. Estis antaŭviditaj, interalie, esploroj pri la eblecoj por plua utiligo de la Internacia Lingvo sur la kampoj de intelektaj interŝanĝoj, trafiko kaj komerco; eldonado de dokumentoj en 10 serioj kun entute 55 sekcioj; publikigado de verkoj kaj studoj; liverado de dokumentaj materialoj al la LA kaj FA. CED, krome, ekde sia fondiĝo ĉiujare publikigis ne nur raporton pri la plenumitaj laboroj, sed ankaŭ planon por la sekva jaro. Nun la raporto kaj laborplano regule aperas en la Jarlibro.

Komence de 1952, do en la jaro de la fondiĝo de CED, estis ellaborita konciza laborplano por agado en ligo kun la Peticio al Unesko, pritraktota de la Ĝenerala Konferenco fine de tiu jaro. Ĝiaj ĉefaj eroj estis: (i) eldono de speciala dokumentaro de CED pri la Internacia Lingvo; (ii) sugestoj al la landaj asocioj rilate kontaktojn kun iliaj respektivaj Naciaj Unesko-Komisionoj; (iii) debatvespero en Parizo okaze de la Konferenco; (iv) eldono de speciala dokumento (CED/3) en la angla, franca kaj hispana por distribuo al ĉiuj delegitoj en la Konferenco; (v) gazetara kampanjo; (vi) raporto pri la rezulto tuj post la Ĝenerala Konferenco; (vii) planado de nova agado depende de la rezulto. Ĉiuj eroj estis sukcese plenumitaj kaj la celo plene atingita, kiel vidiĝas el la materialo publikigita en la januara *Esperanto*, 1953.

Post la Rezolucio de Unesko de decembro 1952, per kiu ĝi decidis komuniki la Peticion al la Ŝtatoj-Membroj kaj definitive pritrakti la aferon dum la 10-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco en novembro-decembro, 1954, en Montevideo, tuj estis ellaborita nova laborplano por taŭge antaŭprepari la reprezentiĝon de UEA kaj la agadon dum la Ĝenerala Konferenco mem. En tiu ĉi ampleksa speciala labor-

plano estis antaŭviditaj la agadoj de la centraj organoj de UEA kaj de la landaj asocioj: (i) interna dokumento de CED por la landaj asocioj kun la titolo *Sugestoj Koncerne Kunmetadon de Raportoj pri Esperanto* (poste 19 LA efektive sendis ampleksajn raportojn al siaj propraj registaroj kaj prezentis la valoron de la Internacia Lingvo el vidpunkto de ĉiu unuopa lando); (ii) organizo de reto da kompetentaj kunlaborantoj interkonsente kun la LA; (iii) aparta raporto de CED rekte al la Sekretariato pri la historio kaj atingoj de Esperanto ĉefe el monda vidpunkto (la raporto de entute 250 tajpitaj paĝoj fariĝis eĉ pli ampleksa ol planite kaj estis poste utiligita por kunmeto de la Raporto de la Sekretariato de Unesko al la Ĝenerala Konferenco); (iv) vizitoj al la Sekretariato en Parizo por priparoli detalojn kaj kompletigi informojn; (v) sendado de CED-dokumentoj al ĉiuj naciaj Unesko-Komisionoj; (vi) invito al la Sekretariato reprezentiĝi dum la UK en Zagreb en 1953 (efektive, reprezentanto de la Sekretariato, P. Lebar, ĉeestis la Kongreson kaj raportis); (vii) granda ekspozicio en Montevideo (speciala „subplano" estis ellaborita nur tiucele); (viii) gazetara kampanjo antaŭ kaj dum la Konferenco (alia „subplano" estis farita por tiu ĉi agado, rezulte de kiu ĉ. 1.500 artikoloj kaj informoj aperis en la monda gazetaro); (ix) eldono de speciala dokumento *La Internacia Lingvo kaj la Kontribuo de la Esperanto-Movado al la Celoj de Unesko* en la angla, franca kaj hispana por distribuo al ĉiuj delegitoj en la Ĝenerala Konferenco; (x) kolekto de financaj rimedoj por plenumi la planon (tiucele estis establita *Fondaĵo Montevideo*, kies rimedoj ebligis la plenumon de ĉiuj eroj de la plano kaj efikan reprezentiĝon dum la Ĝenerala Konferenco).

Ankaŭ tiu ĉi laborplano estis ne nur plenumita, sed multrilate superita, ĉar dum la realigado mem manifestiĝis aliaj eblecoj, kiujn necesis utiligi. La realigo de la plano postulis multajn artikolojn, raportojn, cirkulerojn en speciala serio, personajn kontaktojn kaj centojn da leteroj por evoluigi kaj kunordigi la laboron, por establi kiel eble plej firmajn kontaktojn kaj atingi, ke ĉiuj kunlaborantoj tra la mondo estu daŭre informataj pri ĉio, eĉ nur iom grava, tiel ke atingo en unu lando estu utiligita por simila atingo en aliaj landoj. La nova dujara sistema kaj laŭplana agado, kiu aktivigis la plej pozitivajn fortojn de UEA kaj entuziasmigis ĉiujn, rezultigis la konsultajn rilatojn kun Unesko kaj la faman Rezolucion de la 10-a de decembro 1954 [25].

En 1952 la Estraro por la unua fojo prezentis al la Komitato jaran laborplanon por 1952-53. Ĝi estis ellaborita de la tiama estrar-

25. La Rezolucio estas regule publikigata en la *Jarlibro*.

ano pri informado, kongresaj kaj juraj aferoj, kaj rilatis ĉefe al la fortikigo de la ligoj kun la LA kaj FA, delegita reto, CED, informado, ISU, la programon de la UK en Zagreb (sekcioj, konkursoj, Kongresa Gazetara Servo). En la julia-aŭgusta *Esperanto*, 1952, estis publikigita 13-paĝa teksto pri informado: plano de informado por 1952-53, organiza skemo de la informaj fakoj, eraroj en informado, devizoj kaj sloganoj, ekspozicioj, afiŝoj, flugfolioj, k.a. Tiu materialo multe helpis al sistemigo de la laboro en tiu grava sfero kaj al kvalita plibonigo de informado. En 1956 ĝi servis kiel bazo por la diskutoj en la kunveno de la reprezentantoj de la informaj fakoj (IF) en Frostavallen, Svedio. La esenco de la konkludoj estas entenata en *Fundamenta Principaro de Informado pri la Internacia Lingvo*, pli konata kiel *Principaro de Frostavallen*, plu valida.

Similan unujaran planon la Estraro faris por la periodo 1953-54, sed ĝi enhavis ankaŭ erojn pri la eksteraj rilatoj, precipe kun Unesko, kaj pri la publikigo de *La Internacia Lingvo — Faktoj pri Esperanto*, kiu efektive aperis en 1954 kiel eldonaĵo de CED.

Post la spertoj kaj la elstare pozitivaj rezultoj de planado en la periodo 1951-1954, precipe post la atingoj en Unesko en decembro 1954, maturiĝis la ideo ellabori bazan laborprogramon por pli longa, nedifinita periodo, aldone al la okazaj laborplanoj por atingi konkretajn aktualajn celojn. Dum la printempa kunsido de la Estraro en marto 1955 estis prezentita projekto, kiun la Estraro akceptis kaj decidis transdoni ĝin por pritrakto al la Komitato dum la UK en Bolonjo (1955). La teksto estis publikigita en la junia *Esperanto*, 1955, kun jena akompana noto de la prezidanto:

> Estrarano D-ro Ivo Lapenna prezentis al la Estraro planon pri la ĉefaj aktivecoj de UEA en la sekvantaj jaroj rezulte de la decidoj de Unesko. Dum siaj kunsidoj de la 19/20-a de marto la Estraro diskutis la planon kaj decidis proponi ĝin al la Komitato por diskuto kaj decido dum la Kongreso en Bologna kiel Bazan Labor-Programon de UEA. Por ke la tuta membraro havu eblecon informiĝi pri ĝi kaj povu eventuale fari pliajn sugestojn, la Estraro plue decidis publikigi ĝin en la oficiala organo de la Asocio. Ĉiujn eventualajn sugestojn koncerne la Bazan Programon oni sendu al la prezidanto de UEA.

Dum la UK en Bolonjo la plano estis pridiskutita en du komisionoj (2-a kaj 4-a), kiuj rekomendis ĝin preskaŭ senŝanĝe por akcepto al la Komitato. Tiu ĉi unuanime aprobis la Programon en la lasta kunsido de la pleno. Tiamaniere en 1955 estis akceptita la Unua Baza Laborprogramo de UEA samtempe kun la nova Statuto. La aprobita teksto aperis en la *Jarlibro, Dua Parto*, 1956.

18.3.3.2 *Celoj kaj Karaktero.* — La karakteron de ĉiu unuopa agadprogramo aŭ plano determinas ĝiaj celoj. Tiurilate, du ĉefaj specoj estas distingendaj: la bazaj programoj kaj la okazaj planoj.

La bazaj programoj antaŭvidas multajn agadojn por pli longa, nedifinita periodo, direktitajn al la plenumado de la celoj de la Asocio laŭ ĝia Statuto. Pro la koncepto de kunligiteco kaj interdependeco, la programoj necese enhavas erojn kun konstanta karaktero, kiuj devus esti plenumataj kiel eble plej bone sur ĉiuj niveloj, daŭre, ĝis la ĝeneraliĝo de la uzo de Esperanto. Tiaj, ekzemple, estas la eroj rilatantaj al nombra, financa, fakte ĉiuflanka fortikigado de UEA kaj de ĉiuj organizaĵoj en ĝia kadro; aŭ al altigado de la prestiĝo de la Asocio; aŭ al plua evoluigado de la lingvoinstruado, k.s. La konstantaj taskoj troviĝis en ambaŭ bazaj laborprogramoj kaj devos enesti ankaŭ en la estontaj. Aliflanke, la bazaj programoj formulas ankaŭ difinitajn konkretajn taskojn, kies realigon oni povas atendi en relative baldaŭa estonteco prenante en konsideron la antaŭajn atingojn, la gradon de organiziteco, la disponeblajn fortojn kaj financajn rimedojn. Ĉar la eblecoj de realigo dependas ankaŭ de eksteraj faktoroj, aldone al la internaj kaj al eventualaj neatenditaj surprizoj, oni ne povas antaŭvidi en la programo precizajn datojn por ĝia plena realigo. Realeca programo de socia-kultura organizaĵo, dependa ĉefe de bonvolo kaj kotizoj, povas nur difini la ĉefajn celojn, indiki la taskojn kaj rimedojn por realigo de la celoj, instigi al la plenumado, maksimume kunligi la unuopajn agadojn, sed neniel rajtas precizigi la tempon de la realigo. Ĝuste tial la bazaj programoj de UEA estis faritaj por nedifinita periodo, sed kun emfazo pri la fakto, ke la plenumon favoras konkretaj eksteraj cirkonstancoj kaj ebligas la ekzistantaj fortoj de la Asocio en relative mallonga tempo.

Diference de la bazaj programoj, la okazaj planoj estas farataj por atingi difinitajn aktualajn celojn okaze de diversaj eventoj, tempe fiksitaj. Al tiu kategorio apartenis ĉiuj okazaj laborplanoj de UEA, ekzemple la jam menciitaj en ligo kun la pritrakto de la Peticio fare de Unesko, aŭ la postaj en ligo kun la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, celebrado de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj, Jaro de Internacia Kunlaboro ktp. Ĉar multe pli konkretaj, tiuj planoj povas precize difini la celojn, kutime en formo de minimumaj kaj maksimumaj. Ekzemple, ambaŭ laborplanoj en ligo kun la Peticio enkonduke determinis la maksimumajn kaj minimumajn celojn. En 1952 estis atingita la maksimuma celo; en 1954 la atingo troviĝis meze inter la planitaj maksimumo kaj minimumo. Depende de la graveco, la okazaj planoj konsistas el pli aŭ malpli multe da kunligitaj taskoj. Ekzemple, la planoj okaze de

la Zamenhof-Jaro aŭ Jaro de Internacia Kunlaboro estis multe pli detalaj, ol la planoj faritaj okaze de la Internacia Jaro de Edukado aŭ Internacia Jaro de la Libro. Ĉiuj okazaj planoj, ĝuste pro tiu sia karaktero, klare precizigas la tempon de realigo: ĝi estas identa kun la tempodaŭro de la evento.

Komuna trajto de ĉiuj laborprogramoj kaj planoj estas la jenaj kvar esencaj elementoj: celoj, taskoj por realigo de la celoj, homaj fortoj (organizo de reto da kompetentaj kunlaborantoj), minimumaj financaj rimedoj. Malatento al nur unu el tiuj kvar elementoj signifas anticipan fiaskon. Ĉiuj programoj kaj planoj de UEA atentis ilin plej rigore.

Rilate la proceduron ekzistas malgranda diferenco inter la bazaj programoj kaj okazaj laborplanoj. La bazaj programoj estis kaj plu devos esti farataj laŭ jenaj stadioj: ellaboro de projekto de la programo; prezento al la Estraro por diskuto, eventualaj amendoj kaj aprobo; publikigo en la organo de la Asocio por ebligi al la tuta membraro komenti en formo de aldonoj, ellasoj, ŝanĝoj; prezento de la projekto kun la eventualaj amendoj al la Komitato; pritrakto en unu el la komisionoj; fina pritrakto en la Komitato kaj akcepto. La okazaj planoj estis nur escepte, depende de la graveco, prezentitaj por diskuto al la tuta membraro, sed cetere ankaŭ ili trapasis la saman proceduron, kiel la bazaj programoj. Nur se temis pri tute malgrandaj okazaj laborplanoj, konformaj al la Statuto, valida baza programo kaj antaŭa decido de la Komitato, ili estis pritraktitaj nur de la Estraro. Kompreneble, ankaŭ en tiaj kazoj la Komitato ĉiam rajtis kaj plu rajtos aprobi aŭ malaprobi. La samo rilatas al „sekciaj" laborplanoj faritaj en la kadro de iu jam aprobita programo. Tiaj laborplanoj povas troviĝi en la manoj de la respondeca funkciulo. Ekzemple, la „subplano" por la Universala Ekspozicio en Montevideo, aŭ la „subplano" por la gazetara kampanjo antaŭvidita en la laborplano por Montevideo. havis tian karakteron.

Sukcesa plenumado de kiu ajn el la laborprogramoj kaj planoj postulas amason da plia organiza laboro: artikoloj kun analizoj de la unuopaj punktoj, konsiloj pri la metodoj aplikendaj, instigaj informoj pri la progresoj faritaj; internaj cirkuleroj pritraktantaj la taktikon en apartaj situacioj kaj kondiĉoj; korespondado inter la respondeca funkciulo aŭ centra instanco kaj la multnombraj kunlaborantoj en diversaj landoj; liverado de prespretaj artikoloj aŭ informoj por publikigo en la Esperantaj aŭ nacilingvaj gazetoj; prelegoj por la ĝenerala publiko; sciigoj por la radio ktp.

Ne neglekteblaj estas la kromefikoj de la programoj kaj planoj, kelkfoje same gravaj kiel la celoj mem. Ĉiuj ĝisnunaj programoj

kaj planoj de UEA kaŭzis aldonajn rezultojn, en pluraj kazoj veran ĉenon da kromefikoj. Ili aŭtomate aktivigas la kolektivajn kaj individuajn membrojn, kio kontribuas per si mem al forĝado de unueco tra kunlaboro. La plenumado fortikigas la tutan Esperanto-Movadon, altigas la prestiĝon de UEA, evidentigas la avantaĝojn de planita kunagado, kio helpas difinon de pliaj celoj en novaj planoj surbaze de la atingitaj rezultoj. La okazaj planoj, krome, ĉiam kaŭzis ankaŭ aliajn kromefikojn. Ekzemple, la okazaj planoj rezultigis unuarangan informadon, plurfoje en amasaj dimensioj. Miloj da artikoloj kaj informoj pri la Internacia Lingvo aperis en la monda gazetaro en ligo kun la grandaj kampanjoj okaze de la traktado de la Peticio fare de Unesko (1951-1954), Zamenhof-Jaro (1959), k.a. Simile rilate radiajn kaj televidajn programojn kaj aliajn instrumentojn de publika informado. Dank' al tiaspecaj kromefikoj favore ŝanĝiĝas la publika imago pri la signifo kaj rolo de la Internacia Lingvo, kio siavice helpas la plenumadon de la bazaj programoj kaj de la celoj laŭ la Statuto.

18.3.3.3 *Bazaj Programoj.* — Ĝis 1973 UEA havis du bazajn programojn: tiun de 1955 kaj tiun de 1962.

Kiel dirite, la *Unua Baza Laborprogramo* estis akceptita de la Komitato dum la UK en Bolonjo (1955). Ĝi konsistis el 5 partoj: Enkonduko, Eksteraj Taskoj, Internaj Taskoj, Financaj Demandoj, Konkludo. En la enkonduka parto estis koncize prezentita la situacio post la decidoj de Unesko, faritaj en decembro de la antaŭa jaro. La parto pri eksteraj taskoj konsistis el pluraj punktoj, precipe koncerne la ligojn kun UN kaj Unesko, agadojn sur la kampo de edukado, scienco kaj kulturo, fakaj kongresoj, leksikonoj kaj enciklopedioj. La tria parto estis dividita en jenajn kvar grupojn de taskoj: organiza fortikigo de UEA, informado, kursoj kaj kulturaj problemoj. Ĝi enhavis konkretajn erojn, ekzemple la vendon de la domo en Heronsgate; modernigon de la CO per taŭgaj oficejaj instrumentoj kaj per malgranda moderna presejeto; eldonadon de la bulteno de la IGS ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la angla kaj franca por sendo rekte al gazetoj kaj revuoj en landoj sen informaj fakoj; eldonon de specialaj flugfolioj kaj prospektoj en pluraj lingvoj, precipe por la neesperantistaj kongresoj; utiligon de la materialoj de la Universala Ekspozicio por okazigo de similaj ekspozicioj en diversaj landoj; konstantan superrigardon pri la informa laboro en la mondo kaj kunvenojn de la reprezentantoj de la landaj informaj fakoj; internacian diplomon por Esperanto-instruistoj; kontrolon de lernolibroj kaj kritikon de lernolibroj kaj vortaroj, kiuj deformas la lingvon; internacian kunligon de geinstruistoj kaj gelernantoj en lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata; helpon al

la Akademio de Esperanto; fondon, en kunlaboro kun ILEI, de pedagogia revuo aŭ helpon por fondi tian revuon; pli intiman kunlaboron kun ISAE, fondon de Eldona Fako de UEA, k.a. La kvara parto rilatis al havigo de financaj rimedoj por realigo de la plano. Ĝi emfazis, ke la kotizoj devus pagi ĉiujn regulajn elspezojn por la administrado de la CO kaj de la Serva Centro, dum la licencpagoj de la UK, la eventualaj puraj profitoj de la UK kaj aliaj internaciaj aranĝoj, la donacoj kaj heredaĵoj devus esti utiligataj por la plenumo de ĉiuj aliaj agadoj. Estis esprimita la fido, ke la insista realigado de la plano kaŭzos nombran kreskon de la membraro, kuraĝigos donacojn kaj heredaĵojn, helpos al okazaj planoj. La konkludo koncize formulis la tezon, ke nur paralela agado en ĉiuj menciitaj direktoj certigas la sukceson.

La Unua Baza Laborprogramo estis grandparte realigita fine de 1961. La Raportoj de la Estraro por la laborjaroj 1955-56 ĝis 1961-62, publikigitaj en la Jarlibro, entenas la ĉefajn atingojn de la Asocio kaj ĝenerale de la Esperanto-Movado en tiu periodo. Kiel atendite, kelkaj eroj de la Programo ne povis realiĝi, ĉefe pro kaŭzoj ekster la povo de la respondecaj organoj de UEA, sed, aliflanke, multaj aliaj punktoj, ne antaŭviditaj en la Programo, povis esti sukcese plenumitaj. Ĝenerale parolante, la ĉefaj celoj estis atingitaj. Ekstere la pozicioj de la Internacia Lingvo konsiderinde pliboniĝis kaj la prestiĝo de UEA kiel reprezentanto de la neŭtrala Esperanto-Movado multe altiĝis. Interne la Asocio fortikiĝis organize kaj idee. Rezulte, la membraro preskaŭ duobliĝis. Pro la plenumo de la taskoj antaŭviditaj en la Unua Baza Laborprogramo, kiel ankaŭ pro la ŝanĝitaj cirkonstancoj en la mondo, necesis fiksi en nova baza laborplano la principojn de agado en la sekva periodo.

La Dua Baza Laborplano de UEA estis akceptita de la Komitato dum la UK en Kopenhago (1962). Laŭ la Art. 30 de la Statuto la projekton ellaboris la ĝenerala sekretario. Ĝi estis publikigita en la marta *Esperanto*, 1962, kaj submetita al publika diskuto. En aprilo ĝin pritraktis la Estraro. Poste, kiel kutime, ĝi estis pritraktata en komisiono de la Komitato kaj fine, kun kelkaj amendoj, akceptita en plena kunsido.

La Dua Baza Laborplano estas multe pli ampleksa kaj detala ol la unua. Ĝi konsistas el jenaj partoj: Enkonduko, Celo, Internaj Taskoj, Eksteraj Taskoj, Konkludo. En la Enkonduko estas prezentitaj la atingoj laŭ la antaŭa programo. En la parto rilatanta al la celo troviĝas du gravaj punktoj: premisoj por la solvo de la lingva problemo per la Internacia Lingvo kaj graveco de organizita agado. La parto Internaj Taskoj vicigas en 10 punktoj, ĉiu kun multaj eroj, la ĉefajn taskojn de la centraj organoj, unuflanke, kaj de la LA, FA

kaj lokaj societoj, aliflanke. Identan dividon havas la parto Eksteraj Taskoj kun adekvataj konkretaj eroj en tiu sfero. La konkluda parto emfazas la principon de centrigo kaj malcentrigo. Ĝi komenciĝas per jenaj vortoj: „Tiu ĉi Laborplano estas bazita sur la fundamenta principo centrigi ĝis maksimumo la klopodojn al difinitaj celoj kaj malcentrigi la agadon mem ĝis la plej vastaj bazoj de la organizita Esperanto-Movado".

Pro la pritraktita konsisto de UEA kaj pro ĝia interna demokrateco, la Dua Baza Laborplano precizigis kaj detaligis nur la taskojn de la centraj organoj, lasante al la LA, FA kaj lokaj societoj plenan liberecon en la ellaborado de la propraj laborplanoj konforme al la ĝeneralaj taskoj sugestitaj en la Dua Baza Laborplano aparte por la landaj asocioj, lokaj societoj kaj fakaj organizaĵoj. La fundamenta ideo estis, ke ĉiu landa asocio ellaboru propran konkretan programon prenante en konsideron la landajn cirkonstancojn kaj eblecojn, sed atentante al difinitaj komunaj taskoj de la tuta Asocio. Same tiel la fakaj organizaĵoj estis alvokitaj prepari proprajn konkretajn programojn, sed kun aparta konsidero al nombro da ĝeneralaj taskoj. Siavice, la lokaj societoj estis invititaj plani siajn agadojn en la vastaj kadroj de la Dua Baza Laborplano de UEA kaj de la plano de la koncerna landa asocio.

Aldone al la konstantaj taskoj, ankaŭ la Dua Baza Laborplano antaŭvidis grandan nombron da aktualaj taskoj, realigeblaj en relative mallonga tempo. Al tiu lasta grupo apartenis, ekzemple, la ordigo de la propra domo de UEA en Rotterdam; plua modernigo de la oficejo; havigo de donacoj por unuopaj ĉambroj en la domo (5.000 gld), kiuj ricevos la nomon laŭ la deziroj de la donacintoj; ordigo de la biblioteko; prilaboro de la Principaro de Frostavallen; konferencoj de la reprezentantoj de IF; evoluigo de la UK, tiel ke ili fariĝu ĉiam pli atentataj mondaj kulturaj manifestacioj; artaj festivaloj kaj konferencoj de sciencistoj aŭ teknikistoj; kuraĝigoj per aŭspicioj aŭ alimaniere al internaciaj renkontiĝoj kun kultura programo; daŭrigo de la serio Oriento-Okcidento; utiligo de la akirita nova pozicio (kategorio B) en la konsultaj rilatoj kun Unesko por efike kunlabori kun tiu Organizaĵo kaj kun UN en ĉiuj aferoj, kiuj interesas la Esperanto-Movadon; eldono de aparta informa broŝuro por la landoj de Afriko, kaj multaj aliaj [26].

Dum la diskuto de la projekto kelkaj starigis la demandon ĉu la Laborplano havas devigan karakteron por ĉiuj organizaĵoj kaj individuaj membroj, el kiuj konsistas UEA, aŭ ĝi estas deviga nur por la centraj organoj de la Asocio. Se oni komprenas la vorton

26. La Dua Baza Laborplano aperis en la broŝuro *Statuto kaj Regularoj de UEA*, Rotterdam, 1968.

„deviga" en la senco de perforta altrudo, tiam, evidente, la Laborplano estas deviga por neniu. Sed se oni korekte konceptas la kaŭzojn, celojn kaj metodojn de organizita laboro entute, tiam la Laborplano, akceptita de la Komitato post vastega diskuto, estas morale deviga por ĉiuj: almenaŭ tiom, kiom estas laŭ la Statuto kaj la Regularoj de la Asocio. Se ne estus tiel, ĝi estus superflua. La observon diktas la koncepto de demokrateco kun libervola memdisciplino.

Tiom tute principe. Tamen, komparo de la realigoj kun la taskoj antaŭviditaj en la Plano montras, ke la centraj organoj jam plenumis preskaŭ komplete sian parton, sed ke kelkaj celoj (ekz. la nombro de membroj) ne povis esti atingitaj ĉefe tial, ĉar multe postrestis la realigo de la taskoj apartenantaj al la LA, FA kaj lokaj societoj. Nur malmultaj el ili fakte planis siajn agadojn kaj per sia celtrafa laboro kontribuis al la realigo de la tuto. Se ĉiuj estus agintaj konforme, la rezultoj certe estus eĉ pli bonaj.

Dum la UK en Londono (1971) la Komitato denove pritraktis la demandon kaj konstatis, ke la ĉefaj celoj de la Dua Baza Laborplano estas realigitaj, kaj ke aliaj, pro la ŝanĝitaj cirkonstancoj, parte malaktualiĝis. Tial la Komitato decidis ellabori la Trian Bazan Laborplanon, konforman al la novaj eksteraj cirkonstancoj kaj la interna forto de UEA. Ĝis la fino de 1972 ankoraŭ ne estis farita konkreta projekto, sed dum kultura aranĝo en Frostavallen (Svedio), komence de aŭgusto 1972, pli ol 100 personoj, el kiuj multaj funkciuloj de LA, FA kaj lokaj societoj, dum tri kunsidoj diskutis ideojn por la nova programo, surbaze de la ekzistanta Plano. Dum la UK en Portland (1972) ankaŭ la Komitato priparolis la aferon. En *Esperanto* estis esprimitaj kelkaj ideoj. Dum la ellaborado de la projekto certe estos prenitaj en konsideron la diversaj sugestoj, precipe la detalaj konkludoj de la kunveno en Frostavallen.

18.3.3.4 *Okazaj Planoj.* — La Asocio akceptis plurajn specialajn planojn okaze de diversaj eventoj. Aldone al la planoj en ligo kun la Peticio al Unesko, menciindaj estas la sekvantaj okazaj planoj:

Laŭ la invito de Unesko, UEA partoprenis en la memorigo de la 10-jara datreveno de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj la 10-an de decembro 1958. Konciza plano estis farita jam en oktobro 1956. En marto 1959 estis publikigitaj la rezultoj: 243 prelegoj pri la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj al ĉ. 19.000 personoj en la lokaj Esperanto-societoj aŭ en aranĝoj, organizitaj de ili; 103 artikoloj kaj informoj en la Esperanto-gazetaro; minimume 120 artikoloj en nacilingvaj gazetoj kaj periodajoj; 9 radio-prelegoj; fotoafiŝoj de Unesko pri la homaj rajtoj kun teksto en la Internacia Lingvo.

La 5-an de aŭgusto 1958 la Komitato akceptis ampleksan Bazan Programon por la celebrado de la 100-jara datreveno de la naskiĝo

de Zamenhof en 1959. La Programo konsistis el 17 punktoj. Estis formita Internacia Organiza Komitato, kiu konsistis el prezidanto Prof. D-ro G. Canuto, sekretario Prof. D-ro I. Lapenna, 10 vicprezidantoj kaj helpa sekretario N. R. Smith. Tuj post la elektiĝo, la 5-an de aŭgusto 1958, la Internacia Organiza Komitato (IOK) akceptis Deklaracion, per kiu ĝi alvokis ĉiujn internaciajn ŝtatajn kaj privatajn organizaĵojn; la internaciajn kaj naciajn sciencajn, klerigajn, kulturajn, komercajn kaj aliajn instituciojn; la direkciojn de televido kaj radio; la redakciojn de gazetoj kaj revuoj; ĉiujn kulturajn aktivulojn memorigi en konvena formo la 100-jaran datrevenon. La Deklaracio estis vaste diskonigita. Baldaŭ estis formita Internacia Patrona Komitato. Ĝi konsistis el 124 elstaraj personecoj de la publika vivo, scienco, literaturo, artoj kaj kulturo ĝenerale. Kompleta listo aperis en la januara kaj februara numeroj de *Esperanto*, 1959. Dum la tuta jaro 1959 viciĝis unu post la alia diversaj eventoj: de nomigo de placoj aŭ stratoj laŭ la nomo de Zamenhof ĝis solenaj kunsidoj en sciencaj institucioj. La Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio (1959) kun la vizito al Bjalistoko kaj la decembraj aranĝoj markis la du kulminajn punktojn de la Zamenhof-Jaro, precize kiel antaŭvidite en la plano. La plej elstara atingo, ne antaŭvidita eksplicite en la plano, sed ja firme atendata (rezulte de aparte entreprenitaj paŝoj), venis nur la 15-an de februaro 1960, kiam la Ĝenerala Direktoro de Unesko komunikis al ĉiuj registaroj kaj ĉiuj neregistaraj organizaĵoj, ke la Plenuma Komitato de Unesko deklaris, dum sia 55-a sesio, D-ron L.L. Zamenhof unu el la grandaj personecoj de la homaro. Dank' al bona organizo, al la internacia harmoniigo de la agado kaj al trafa laboro de multaj organizaĵoj kaj unuopuloj, la fundamenta ideo de tiu speciala Baza Programo kaj la esenca celo de la Zamenhof-Jaro en ambaŭ aspektoj — digna omaĝo al la aŭtoro de la Internacia Lingvo kaj samtempe vasta diskonigo de lia verko — realiĝis tre kontentige. La tuta materialo aperis en *Memorlibro*, publikigita okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof, en 1960 kiel eldono de CED.

En julio de 1963 la Estraro akceptis mallongan okazan planon por kontribui al la celebrado de la 15-jara datreveno de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj. La plano konsistis el 6 punktoj kaj antaŭvidis, interalie, la eldonon de la Universala Deklaracio en Esperanto-traduko; artikolojn kaj prelegojn kaj aliajn aranĝojn, similajn al tiuj por la celebrado de la 10-jara datreveno en 1958. Ankaŭ tiu plano estis plene realigita.

Unu el la plej grandaj kaj gravaj okazaj laborplanoj estis farita en 1964 por la partopreno de UEA en la Jaro de Internacia Kunlaboro (JIK) en 1965, konforme al la Rezolucio de la Ĝenerala Asem-

bleo de UN de la 19-a de decembro 1962. La definitivan Laborplanon akceptis la Komitato dum la UK en Hago (1964). La Laborplano konsistis el du partoj: la unua rilatis al la kontribuo de UEA al la ĉefa celo de JIK, nome al la progresigo de kunlaborado inter la popoloj, al internacia kompreniĝo, al forigo de tensioj kaj al fortikigo de la monda paco; la dua, firme ligita al la unua grupo de agadoj, koncernis la laboron favore al la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj, sen kio ne estas imagebla plena interkompreniĝo. La dokumento antaŭvidis konsiderindan nombron da agadoj sur internacia, landa kaj faka niveloj. Ĝi estis publikigita en la januara *Esperanto*, 1965, en la Jarlibro por 1965 kaj, krome, aparte sendita al ĉiuj aliĝintaj kaj kunlaborantaj Esperanto-organizaĵoj. Speciale grava agado en la kadro de la plano estis la Propono al UN [27].

La rezultoj de tiu grandega kampanjo, en kiu partoprenis ĉiuj Esperanto-organizaĵoj en la kadro de UEA kaj tre multaj unuopaj membroj, apartenas al la plej elstaraj en la historio de la Esperanto-Movado. La plano estis plenumita sur ĉiuj niveloj konforme al ĉiuj antaŭviditaj punktoj: artikoloj en la Esperanta kaj nacilingva gazetaro; programo de la UK en Tokio (1965); ISU kaj programo de Oratoraj Konkursoj; korespondado inter la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata; sonbendaj programoj; aro da CED-dokumentoj; speciala glumarko por memorigi JIK; Propono al UN; landaj kaj regionaj kongresoj, kaj multaj aliaj. Dokumento de CED, kiu resumas la ĉefajn atingojn (CED I/VII/5) surbaze de ricevitaj fidindaj raportoj, taksas, ke, pro la agado de UEA sur la internacia kaj landa niveloj, almenaŭ 50 milionoj da personoj estis en tiu aŭ alia formo informitaj pri la JIK kaj pri la ĉefaj aspektoj de la laboro de Uniĝintaj Nacioj. La flankefikoj de la agado estis grandegaj. Eĉ senkonsidere al la amasa informado per ĉiuj rimedoj de komunikado, la nura fakto, ke la Proponon subskribis preskaŭ unu miliono da individuaj personoj kaj iom malpli ol 4.000 organizaĵoj kun ĉ. 73 milionoj da membroj, estas pli ol atentinda kromefiko.

En septembro 1966 estis akceptita konciza agadplano por la celebrado de la Jaro de Homaj Rajtoj en 1968, konforme al la invito de Unesko. Aparte menciinda punkto estis la esplorado kaj dokumentado pri lingva diskriminacio sur nacia kaj internacia niveloj. Estis antaŭvidite, ke dum la UK en Madrido (1968) unu sekcio estos plene dediĉita al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Aliaj punktoj estis: publikigo de la dua eldono de la Universala Deklaracio en Esperanto kaj aperigo de memoriga glumarko kun teksto en la Internacia Lingvo. Ĉiuj eroj estis plenumitaj. Aparte gravaj

27. V. detalojn en Ĉap. 22.

estis la prelegoj pri la homaj rajtoj dum la UK en Madrido kaj diversaj artikoloj pri la temo. La artikolo *Kultura Genocido kaj Homaj Rajtoj,* unue publikigita en la decembra *Esperanto,* 1968, aperis poste en nacilingvaj tradukoj en pluraj gravaj fakaj periodaĵoj.

En junio 1969 estis ellaborita okaza plano por la Internacia Jaro de Edukado, iniciatita de Unesko por 1970. Fine de la monato ĝi estis komunikita al la Ĝenerala Direktoro de Unesko. La ĉefaj punktoj estis: studoj kaj esploroj pri edukaj demandoj en diversaj landoj, precipe koncerne la instruadon de fremdaj naciaj lingvoj kaj de Esperanto; dokumentoj pri la eduka valoro de Esperanto-instruado en lernejoj; konferenco pri disvastigo de la Esperanto-instruado en lernejoj; ekspozicioj pri edukaj temoj; utiligo de la simbolo de IJE. En la periodaĵo de Unesko *International Education Year 1970* (Internacia Jaro de Edukado 1970) aperis preskaŭ komplete la programo de UEA. En tiu agado vigle partoprenis la Junulara Sekcio kaj ILEI. UEA sukcese plenumis ankaŭ la taskojn formulitajn en tiu speciala plano, kiel vidiĝas el la Estrara Raporto, publikigita en la *Jarlibro, Dua Parto, 1971,* en la Ĉap. Eksteraj Rilatoj.

Fine, en 1971 estis ellaborita konciza laborplano okaze de la Internacia Jaro de la Libro en 1972. La ĉefa celo de la plano estis la propagando de la Esperanta libro. Aperis serio da artikoloj kaj ankaŭ belaspekta glumarko en 80.000 ekzempleroj laŭ la modelo de tiu, publikigita de Unesko.

18.3.4 Tuteco de la Organiza Kadro

La Statuto estas la fundamenta konstitucia akto de la Asocio. Konforme al la Statuto pli detalaj reguloj estas formulitaj en la Ĝenerala Regularo, Kongresa Regularo, Regularo pri la Elekto de Honoraj Membroj kaj Honoraj Prezidantoj, Regularo pri la Honora Patrona Komitato, Regularo pri la Internacia Somera Universitato, Regularo pri la Belartaj Konkursoj, Regularo pri la Oratora Konkurso por la Junularo, kaj Regularo por la Internacia Ekzamena Komisiono. Ĉiuj menciitaj Regularoj, nun validaj, estis akceptitaj de la Komitato en la pritraktata periodo de la lastaj 25 jaroj. Kelkaj el ili restis senŝanĝaj ekde la komenco, dum aliaj estis plurfoje amenditaj.

El la Statuto fontas ankaŭ la bazaj programoj kaj la okazaj planoj de la Asocio. La tuto de la Statuto, Regularoj, valida Baza Programo, aktualaj okazaj Laborplanoj, Principaro de Frostavallen kaj eventuale aliaj fundamentaj dokumentoj formas la vastan organizan kadron, en kiu kaj tra kiu estas realigata la multfaceta agado de UEA.

18.4 TRAJTOJ DE LA NUNA STRUKTURO

18.4.1 Konsisto (Membreco)

UEA konsistas el asociaj membroj (AM) kolektive aligitaj de la aliĝintaj landaj asocioj (LA); fakaj asocioj neŭtralaj kaj neneŭtralaj (FA); individuaj membroj (IM) de diversaj kategorioj; Honoraj Prezidantoj (HP) kaj Honoraj Membroj (HM); Membroj de la Honora Patrona Komitato.

18.4.1.1 *Landaj Asocioj.* — Temas pri Esperanto-organizaĵoj, kies agado etendiĝas sur difinita teritorio, kutime la teritorio de la koncerna ŝtato, sed kelkfoje, precipe en kazo de federaciaj ŝtatoj, nur sur unu aŭ pluraj unuoj de la federacio. La interna organiza strukturo malmulte varias de lando al lando. Ĉiuj LA havas sian statuton, en kiu estas difinitaj la celoj. Inter ili unuavice troviĝas la disvastigo de la Internacia Lingvo, ofte ankaŭ la diskonigo de la propra nacio aŭ ŝtato en eksterlando, kio estas tute konforma al la celoj de UEA kaj neniel kontraŭas ĝian neŭtralecon.

La LA, nomataj ankaŭ alimaniere (ekz. societo, ligo, federacio, k.s.), konsistas el lokaj grupoj, kluboj, societoj, sekcioj kaj ankaŭ el individuaj membroj. Pro la graveco de la lokaj societoj (LS), UEA dediĉis al ili specialan atenton en la Dua Baza Laborplano, per serio da artikoloj en *Esperanto* ekde oktobro 1962, per eldono de la broŝuro *La Esperanto-Societo* (1966) kun artikoloj kaj Modela Statuto de Loka Grupo, per la broŝuro *Listo de Lokaj Societoj* kun esencaj detaloj surbaze de enketo farita de CED en 1964 [28].

La LA aligas al UEA ĉiujn siajn membrojn, kiuj ne estas IM de la Asocio, kaj pagas por ĉiu el ili tre malaltan jaran kotizon (en 1972 nur 0,50 gld. jare). Ili nomiĝas asociaj membroj (AM), ricevas membrokarton kaj rajtas uzi ĉiujn servojn de la Asocio. Por la jaraj statistikoj de UEA pri la nombro de membroj en unuopaj landoj, la AM kaj la IM laŭ diversaj kategorioj estas aparte kalkulataj, tiel ke neniu estas kalkulita du fojojn. Nur la sumo de ambaŭ ĉefaj grupoj prezentas la tuton, kiu rajtigas ĉiun aliĝintan LA je difinita nombro da komitatanoj A, kiel montrite supre en 18.2.4.

En 1972 UEA konsistis el 34 landaj asocioj, same kiel en 1971, kiam la nombro de AM estis 25.048. Pro diversaj kaŭzoj pluraj aliaj LA troviĝis ekster UEA. Kelkaj el ili estis aŭ tro malfortaj por aliĝi aŭ nur en stadio de formiĝo. En aliaj kazoj temis pri pliaj or-

28. La enketo montris, ke en 1964 funkciis minimume 1.299 lokaj societoj kun entute 36.346 membroj en 39 landoj. La nombro certe estis pli granda, ĉar la respondoj venis nur el 39 landoj, kaj ankaŭ el tiuj landoj ne ĉiuj LS resendis la demandaron kun respondoj.

ganizaĵoj, apenaŭ kompareblaj al LA en la vera senco de la vorto, en la kadro de iu pli vasta. Ekzemple, aldone al tutlanda Komisiono de Sovetaj Esperantistoj, en Soveta Unio funkciis la armena, estona, latva, litova, ukrajna kaj uzbeka Esperanto-Komisionoj aŭ sekcioj de iu alia organizaĵo. Aldone al Ĉeĥoslovakia Esperanto-Federacio (nealiĝinta), sur la teritorio de Ĉeĥoslovakio funkciis Ĉeĥa Esperanto-Asocio (aliĝinta) kaj Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko (nealiĝinta). En Nederlando funkciis Federacio de Esperanto-Organizoj, kies parto estas la aliĝinta neŭtrala nederlanda asocio LEEN. En du landoj ekzistis organizaĵoj kun pretendo al karaktero de LA, sed paralelaj kun la jam aliĝintaj LA el la samaj ŝtatoj. Tiuj faktoj reduktas la nombron de nealiĝintaj LA, kiuj verŝajne plenumas la aliĝkondiĉojn laŭ Art. 13 de la Statuto (minimuma nombro de membroj, organiziteco, neŭtraleco), al ne pli ol kvin aŭ ses. Ilian ĝisnunan nealiĝon plej kredeble malhelpis la cirkonstancoj en la propraj landoj, ekzemple la milito en la kazo de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, aŭ aliaj gravaj kaŭzoj.

Aktuala listo de ĉiuj aliĝintaj kaj nealiĝintaj LA troviĝas en la lasta eldono de la *Jarlibro* de UEA; ekzamenante ĝin oni devas konsideri la suprajn faktojn. Historia skizo pri la evoluo de la Esperanto-Movado en unuopaj landoj, kiel ankaŭ pri la formiĝo kaj nuna situacio de ĉiuj aliĝintaj kaj nealiĝintaj LA, estas jam prezentita en Ĉap. 15.

18.4.1.2 *Fakaj Asocioj.* — Diference de la LA, kies agado etendiĝas sur difinita teritorio, la FA aktivas internacie aŭ nacie en la respektivaj fakoj aŭ specialaj medioj. Distingo estas farata inter la neŭtralaj FA, nome organizaĵoj formitaj laŭ branĉoj de sciencoj, metioj, okupoj k.s., kaj unuiĝoj surbaze de komuna religia, ideologia, politika k.s. aparteno. Ambaŭ estas nomataj FA, sed la unuajn oni traktas kiel neŭtralajn, dum la alia kategorio estas rigardata kiel neneŭtrala.

Ĉiuj FA havas sian statuton. La celoj dependas de la karaktero de la koncerna FA. La plej kutima formulo estas: disvastigi la Internacian Lingvon en la koncerna fako aŭ speciala medio, unuflanke, kaj utiligi la Internacian Lingvon por la respektivaj fakaj aŭ specialaj celoj, aliflanke. La internaciaj FA havas siajn internaciajn reprezentajn organojn, sed pluraj, unuavice la pli grandaj, havas siajn landajn sekciojn. La landaj FA, kiuj ne estas sekcioj aŭ konsistaj partoj de internaciaj FA, agas en siaj fakoj nur sur la respektivaj teritorioj. La Statuto de UEA ebligas kontraktajn rilatojn ankaŭ kun la landaj FA.

La neŭtralaj internaciaj FA povas aliĝi al UEA laŭ la kondiĉoj fiksitaj en la Ĝenerala Regularo. Ili pagas malaltan jaran kotizon

de 100 gld. senkonsidere al la nombro de siaj membroj. La membroj de aliĝintaj FA ne estas inkluzivitaj en la jaraj statistikoj de UEA pri la nombro de la asociaj membroj. Ĉiu aliĝinta FA havas la rajton elekti unu komitatanon A. Se estas pli ol 5 aliĝintaj FA, ili kune elektas entute 5 komitatanojn A, kaj decidas inter si pri iliaj nomoj.

En 1972 al UEA apartenis tri aliĝintaj FA: Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, Internacia Scienca Asocio Esperantista.

La FA, kiuj ne deziras aliĝi al UEA, povas eniri en kontraktajn rilatojn kun la Asocio. La kontrakto antaŭvidas la formojn de kunlaboro kaj fiksas minimuman kontribuon (nun 30 gld.), kiun la kunlaborantaj FA pagas al UEA. Siavice, UEA helpas la FA per publikigo de informoj en la Jarlibro, per havigo de senpagaj ejoj por kunvenoj de la FA dum la universalaj kongresoj, per artikoloj kaj informoj en la organo de la Asocio.

En 1972 UEA havis kontraktajn rilatojn kun 19 internaciaj fakaj asocioj kaj 4 neneŭtralaj internaciaj organizaĵoj, entute 23. Kune kun la 3 aliĝintaj fakaj asocioj, en la kadro de UEA do troviĝis 26 internaciaj fakaj kaj neneŭtralaj asocioj, el kiuj pluraj havis landajn sekciojn kaj individuajn membrojn en multaj landoj. En la *Jarlibro* de UEA regule aperas koncizaj informoj pri ĉiuj aliĝintaj kaj nealiĝintaj FA. Ilia historio, celoj kaj nuna strukturo estas priparolitaj en Ĉap. 16.

18.4.1.3 *Individuaj Membroj.* — Tiu kategorio de membroj estas la plej malnova, establita jam okaze de la fondiĝo de UEA en 1908. La IM aliĝas rekte al UEA kaj estas individue enlistigitaj de la Asocio. Krom la membrokarto kaj markfolio, kiuj rajtigas ilin al diversaj servoj de la Asocio, ili ricevas ankaŭ la periodaĵojn de UEA, depende de la kategorio de membreco. Membro kun *Jarlibro* (MJ) pagas la plej malaltan kotizon de 20 gld. jare kaj ricevas la *Jarlibron.* Membro-Abonanto (MA) pagas pli altan kotizon de 40 gld. jare kaj ricevas la *Jarlibron* kaj la monatan revuon *Esperanto.* Persono, kiu volas finance helpi la Asocion, povas fariĝi Membro-Subtenanto (MS), kiu pagas la kotizon de 60 gld. jare kaj ricevas la *Jarlibron,* la revuon *Esperanto* (se li estas malpli ol 26-jara, ankaŭ la revuon *Kontakto).* Patrono (Pat.) pagas la dekoblan kotizon de MA, kaj ricevas la samajn publikaĵojn kiel MS. Dumviva Membro (DM) pagas por la tuta vivo unu fojon nur 800 gld. kaj ricevas ĝis sia forpaso la samajn eldonaĵojn, kiel MS. Dumviva Patrono (D-Pat.) pagas por la tuta vivo unu fojon 8.000 gld., ĉar li deziras forte finance apogi la Asocion. Li ricevas la samajn eldonaĵojn kiel DM. La kotizoj por gejunuloj malpli ol 22-jaraj estas konsiderinde malpli altaj. Por personoj en la aĝo de 22 ĝis inkluzive 25 jaroj

ekzistas aparta kategorio Membro-Abonanto kun „Kontakto" (MA-K). En tiu kategorio la kotizo estas 40 gld. kaj la membro ricevas la junularan revuon *Kontakto* aldone al la *Jarlibro* kaj *Esperanto.*

Kiel montrite en 18.2.4, la individuaj membroj povas partopreni en la elekto de delegitoj (D), rajtas mem fariĝi ĉefdelegitoj, perantoj, delegitoj, vicdelegitoj kaj fakdelegitoj. Nerekte la IM partoprenas en la elekto de komitatanoj B. Se ili estas ĉefdelegitoj aŭ delegitoj kaj tiel plenumas libervole gravan taskon en la Asocio, ili rekte partoprenas en la kandidatigo kaj elekto de komitatanoj B.

En 1972 la nombro de ĉiuj individuaj membroj estis 7.069. Kompleta laŭlanda statistiko regule aperas en la marta aŭ aprila *Esperanto* por la antaŭa jaro. Resuma statistiko estas publikigata en la jara Raporto de la Estraro.

18.4.1.4 *Honoraj Prezidantoj kaj Honoraj Membroj.* — Konforme al Art. 27 de la Statuto kaj al la Regularo por la Elekto de HM kaj HP, la Komitato povas aparte distingi esperantistojn, kiuj faris gravajn servojn al la tutmonda Esperanto-Movado, per la titolo „Honora Membro" (HM). Kiel Honora Prezidanto (HP) povas esti nomita nur esperantisto, kiu, krome, havis eksterordinarajn meritojn por UEA. Honora Prezidanto rajtas ĉeesti la kunsidojn de la Komitato. HM kaj HP ricevas senpage ĉiujn publikaĵojn de la Asocio.

La Regularo precizigas la kondiĉojn kaj proceduron por la elekto de HP kaj HM. La proponon por elekto rajtas fari aŭ la Estraro de UEA, aŭ minimume tri aliĝintaj landaj aŭ fakaj asocioj, aŭ 5 komitatanoj, apartenantaj al minimume 3 diversaj nacioj. La propono devas enhavi vivdetalojn pri la kandidato kaj informojn pri liaj meritoj, kiuj pravigas la elekton. Se la propono ne estas kompleta, la Komitato povas nomi apartan komisionon por plua esploro de la afero.

Ĝis la fino de 1972 la Komitato honorigis per la titolo de HP nur 8 elstarajn personecojn de la Esperanto-Movado. Iliaj nomoj estas (kun datoj de honora prezidanteco): D-ro L. L. Zamenhof (1908-1917), Eduard Stettler (1924-1940), Intendanto-Generalo L. Bastien (1947-1961), Prof. D-ro Edmond Privat (1951-1962), Hans Kürsteiner (1947-1968), Ernfrid Malmgren (1962-1970), H. W. Holmes, O.B.E. (1964-).

La nombro de HM en 1972 estis entute 17. Ne estas enkalkulitaj la multnombraj HM, kiujn la Komitato estis elektinta en la pasinteco, sed kiuj intertempe forpasis.

18.4.1.5 *Membroj de la Honora Patrona Komitato.* — La Honora Patrona Komitato (HPK) estas reprezenta organo de UEA, kiu konsistas el nedifinita nombro da membroj, elektitaj por la daŭro

de la vivo. La Komitato elektas ilin inter lingvistoj, sciencistoj kaj aliaj eminentaj personoj, kiuj faris gravajn servojn al la Esperanto-Movado, kaj mem parolas kaj verkis en la Internacia Lingvo. La Regularo pri la HPK precizigas plurajn detalojn rilate la meritojn kaj la proceduron por la elekto.

En 1972 la HPK konsistis el Prof. D-ro Björn Collinder, emerita profesoro pri finnugraj lingvoj en la Universitato de Uppsala, Svedio; D-ro W. Drees, estinta Ministro pri Sociaj Aferoj kaj Ĉef-ministro, nun Honor-Ministro en Nederlando; H. L. Elvin, direktoro de la Instituto pri Edukado de la Londona Universitato; Prof. M. Fréchet, emerita profesoro de la Universitato de Parizo, membro de la Sciencaj Akademioj de Francio, Pollando kaj Nederlando, prezidinto de ISAE; Ralph Harry, C.B.E., ambasadoro de Aŭstralio en diversaj ĉefurboj, en 1972 en Bonn; Prof. Seiho Nishi, estinta profesoro de la Universitatoj de Sendai kaj Tokio, iama rektoro de la Universitato de Gunma, prezidinto de ISAE; Prof. Miguel Sancho-Izquierdo, Honora Rektoro kaj estinta rektoro de la Universitato de Zaragoza, D-ro h.c. de la universitatoj de Montpellier, Bordeaux kaj Navarra, membro de la Supera Konsilo de Sciencaj Esploroj, Zaragoza, Hispanio.

18.4.2 Organoj

18.4.2.1 *Komitato.* — La strukturo kaj la demokrata maniero, laŭ kiu estas elektata la Komitato nuntempe, estas jam prezentitaj supre (v. 18.2.4). La nombro de ĉiuj komitatanoj kreskis de jaro al jaro paralele kun la fortikiĝo kaj nombra kresko de UEA. En 1948, post la kunfandiĝo, ĝi konsistis el 35 komitatanoj A, B kaj C. En 1972 la Komitato konsistis entute el 72 personoj: 52 komitatanoj A (el kiuj 3 elektitaj de la aliĝintaj FA), 6 komitatanoj B kaj 14 alelektitaj komitatanoj C. Krome, en la Komitato troviĝis 6 observantoj, nomitaj de la aliĝintaj LA kun malpli ol 150 membroj. Do, la nombro de ĉiuj komitatanoj kaj observantoj estis 78: la plej granda en la historio de UEA.

La Komitato estas iaspeca internacia parlamento de la Asocio. Ĝi difinas la ĝeneralan agadon de UEA; decidas pri aliĝo de LA kaj FA kiel ankaŭ pri kontraktoj kun FA, kiuj ne deziras aliĝi al la Asocio; decidas pri ĉiuj regularoj, bazaj programoj, diversaj planoj kaj aliaj fundamentaj dokumentoj; aprobas la buĝeton kaj ekzamenas la financojn de la Asocio; elektas inter siaj membroj la prezidanton, unu aŭ du vicprezidantojn, la ĝeneralan sekretarion kaj 2-4 pliajn membrojn de la Estraro; decidas pri la agado de la Estraro; rajtas nomi Honorajn Prezidantojn, Honorajn Membrojn kaj Membrojn de la Honora Patrona Komitato. La Komitato decidas

ankaŭ pri ĉiuj aliaj aferoj, kiuj ne estas eksplicite rezervitaj por aliaj instancoj.

La Komitato kunsidas almenaŭ unufoje en la jaro, kutime dum la UK, sed nenio malhelpas, ke, en kazo de urĝeco, ĝi kunsidu ankaŭ ekster la UK. Inter la kunsidoj la Komitato laboras ĉefe en formo de korespondado kaj cirkuleroj. Demandoj, kiuj ne povas atendi la sekvantan kunsidon de la Komitato, estas decidataj per skriba voĉdono. Tio devas okazi, se iu kunsido de la Komitato ne havis la necesan kvorumon, nome se ne ĉeestis minimume duono de ĉiuj komitatanoj. En la pli frua periodo tio okazadis sufiĉe ofte, ĉar multaj komitatanoj ne ĉeestis la kunsidojn, tiel ke la kvorumo ne povis esti atingita, kvankam la Komitato estis konsiderinde malpli granda. En la lastaj jaroj tio okazis nur unufoje, nome post la UK en Portland (1972), kiun, pro la granda distanco, malmultaj komitatanoj el Eŭropo povis ĉeesti. La komitatanoj ne pagas la kongresan aliĝkotizon, sed la vojaĝajn elspezojn kaj restadkostojn en la urbo de la kunsido ili mem pagas. La samon faras ankaŭ la membroj de la Estraro.

18.4.2.2 *Estraro.* — Nun ĝi konsistas el prezidanto, unu aŭ du vicprezidantoj, la ĝenerala sekretario kaj du ĝis kvar pliaj estraranoj. La Statuto preskribas, ke la membroj de la Estraro loĝu prefere en landoj ne tro malproksimaj de la Asocia sidejo kaj deklaru sin pretaj partopreni la kunsidojn de la Estraro kaj Komitato. La regulo rilate la proksimecon al la sidejo estas diktita de la bezono ŝpari elspezojn. Tamen, necesos ĉiam pli atenti aliajn faktorojn (maksimuma internacieco, reflektanta la universalecon kaj geografian etendiĝon de UEA, homogeneco koncerne la bazajn konceptojn kaj agadprincipojn), des pli, ke temas efektive nur pri la elspezoj por la printempa kunsido de la tuta Estraro kaj, eventuale, pri urĝaj kunvenoj de kelkaj estraranoj.

La dua Estraro laŭ la nun valida Statuto estis elektita dum la UK en Varsovio (1959)[29]. Ĝi konsistis el Prof. D-ro G. Canuto, (Italio), prezidanto; Prof. D-ro Hideo Yagi, (Japanio) kaj H. W. Holmes (Britio), vicprezidantoj; Prof. D-ro I. Lapenna (Kroato vivanta en Britio), ĝenerala sekretario; R. Llech-Walter (Francio), N. R. Smith (Britio), D-ro W. Herrmann (F.R. Germanio) kaj Inĝ. A. Rajski (Pollando), estraranoj. Post multaj jaroj la Estraro konsistis el 8 membroj. Ĝi estis unu el la plej internaciaj en la historio de UEA. En tia konsisto la Estraro funkciis ĝis la UK en Bruselo 1960, kiam estrarano R. Llech-Walter retiriĝis pro multaj aliaj taskoj kaj


29. La konsiston de la Estraro, elektita en 1956, v. en 18.3.1 en la fino.

Dekstre: Prof. D-ro G. Canuto (1897-1960), unu el la plej popularaj prezidantoj de UEA.



Sube dekstre: Prof. D-ro H. Yagi (1899-1964), ĝis nun la sola ekstereŭropa prezidanto de UEA.

Sube: H.W.Holmes, O.B.E., la Honora Prezidanto kaj plurfoje aganta prezidanto de UEA.





la komitato elektis, anstataŭ lin, E. J. Woessink kiel estraranon. Nur kelkajn semajnojn poste la Asocion kaj la tutan Esperanto-Movadon trafis grandega perdo: la prezidanto de UEA, Prof. D-ro G. Canuto, mondkonata sciencisto kaj unu el la plej sindonaj agantoj por la Internacia Lingvo, forpasis la 29-an de oktobro 1960, en la aĝo de 63 jaroj [30]. Vicprezidanto H. W. Holmes ekfunkciis kiel aganta prezidanto de la Asocio, sed la cetera Estraro restis senŝanĝa. Nur dum la UK en Kopenhago (1962) estis elektita ne nur la prezidanto, sed ankaŭ la tuta nova Estraro. Ĝi konsistis el Prof. D-ro Hideo Yagi (Japanio) prezidanto; H. W. Holmes, O.B.E. (Britio) kaj E. L. M. Wensing (Nederlando), vicprezidantoj; Prof. D-ro Ivo Lapenna (Britio), ĝenerala sekretario; D-ro A. Albault (Francio), Z. Czuba (Pollando), E. J. Woessink (Nederlando) kaj S. Ziegler (Danlando), estraranoj. Por la unua fojo la prezidanto de UEA estis el lando ekster Eŭropo. Antaŭ la finiĝo de la regula trijara periodo la Asocio suferis novan grandan baton, ĉar la 6-an de majo 1964 forpasis Prof. D-ro Hideo Yagi [31]. Ankoraŭfoje vicprezidanto H. W. Holmes ekfunkciis kiel aganta prezidanto kaj plenumis tiun taskon ĝis la UK en Hago 1964.

En Hago (1964) la Komitato elektis komplete novan Estraron en jena konsisto: Prof. D-ro I. Lapenna (Kroato laŭ nacieco, Brito laŭ ŝtataneco), prezidanto; E. L. M. Wensing (Nederlando) kaj E. Carlén (Svedio), vicprezidantoj; G. Becker (F.R. Germanio), ĝenerala sekretario; D-ro A. Albault (Francio), M. Jaumotte (Belgio), J. Toczyski (Pollando), E. J. Woessink (Nederlando), estraranoj. Krome, por la unua fojo estis kreita la funkcio de reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA, kaj D-ro H. Tonkin elektita por tiu tasko. Samtempe H. W. Holmes estis elektita Honora Prezidanto de UEA pro la grandaj meritoj por la Asocio.

La Estraro elektita en 1967 dum la UK en Rotterdam restis senŝanĝa kun unu escepto: anstataŭ D-ro Albault, kiu pro privataj kaŭzoj ne deziris kandidatiĝi, estis elektita D-ro P. Zlatnar (Jugoslavio). U. Lins (F.R. Germanio) fariĝis reprezentanto de TEJO anstataŭ D-ro Tonkin.

Dum la UK en Madrido (1968) kompletiĝis precize 30 jaroj de membreco en la Estraro por Prof. D-ro I. Lapenna, kaj samtempe 40 jaroj de lia laboro por la Internacia Lingvo. En tiaj cirkonstancoj la prezidanto prezentis la 3-an de aŭgusto al la Komitato sian eksiĝon por ebligi al ĝi elekti novan prezidanton. En la septembra

30. Nekrologo kaj artikolo pri la personeco kaj la lastaj momentoj de Prof. D-ro Canuto (1897-1960) aperis en la decembra *Esperanto*, 1960.

31. Nekrologo aperis en la junia *Esperanto*, 1964.

18.4 TRAJTOJ DE LA NUNA STRUKTURO

Esperanto, 1968, aperis jena informo, bazita sur la Protokolo de la kunsidoj:

> Al tiu ĉi propono respondis unu komitatano post alia: ĉiuj esprimis la plej altan aprezon por la laboro de la prezidanto kaj insiste petis lin ne forlasi la oficon. La prezidanto tamen ne retiris sian proponon, sed petis la elektokomisionon efektive kaj zorge pristudi ĝin dum la venontaj tagoj.
> Kiam rekunvenis la Komitato mardon, la 6-an de aŭgusto, la komisiono pri elektoj prezentis raporton, en kiu ĝi konstatis la „unuaniman aprobon de la festparolado de Prof. Lapenna flanke de la kongresanaro" kaj akceptis „kun sincera aprobo la deziron de la esperantistaro havi ankaŭ estonte Profesoron Lapenna kiel prezidanton de UEA". Ĝi invitis la prezidanton „esprimi mem al la Komitato la kondiĉojn, kiujn li opinias necesaj por pli efika kaj sukcesa funkciado de UEA". La ĉi-supraj „kelkaj fundamentaj tezoj"[32] estas la respondo al tiu invito aprobita de la Komitato. La prezidanto deklaris, ke li pretas plue funkcii kiel prezidanto nur sub la kondiĉo, ke la Komitato ne nur aprobu la ideojn entenatajn en la supraj tezoj kiel esencan bazon de laboro, sed ankaŭ donu al li kaj al la Estraro efikan kaj efektivan helpon en ilia realigo. La Komitato unuanime aprobis la ideojn de la tezaro kaj akceptis la kondiĉojn de la prezidanto.

Restis, do, la sama Estraro.

Laŭ la decido de la Komitato en Madrido, en 1969 okazis novaj elektoj. Retiriĝis estraranoj Jaumotte[33], Toczyski kaj D-ro Zlatnar. Malaperis, laŭ interkonsento kun TEJO, la funkcio de „reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA", kiun laste plenumis U. Lins. Kiel novaj estraranoj estis elektitaj U. J. Moritz (F.R. Germanio), J. Thierry (Francio) kaj J. Uśpieński (Pollando). La prezidanto, du vicprezidantoj, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri financoj kaj administrado restis la samaj.

Fine, dum la UK en Londono (1971) okazis elekto de la nova Estraro, ĉar la Komitato decidis jam en Vieno, ke en 1971 okazos ĉiuj elektoj jam antaŭ la finiĝo de la regula trijara periodo. Denove estis elektitaj la samaj prezidanto, vicprezidantoj kaj ĝenerala sekretario. La aliaj 4 estraranoj estas D-ro W. Bormann (F.R. Germanio),

32. En la sama numero estis publikigitaj „Kelkaj Fundamentaj Tezoj" de la prezidanto. En iom prilaborita formo kaj adaptitaj al la nunaj cirkonstancoj ili aperas en Ĉap. 23 kiel konkluda parto de tiu ĉi verko.
33. Du tagojn antaŭ la UK en Vieno (1970) forpasis Maurice Jaumotte (1899-1970), elstara personeco de la belga kaj internacia Esperanto-Movado, komitatano kaj estrarano de UEA dum pluraj jaroj. Nekrologo aperis en la septembra *Esperanto*, 1970. Pro la forpaso ne povis realiĝi la propono de la Estraro al la Komitato pri lia Honora Membreco.

J. Uśpieński (Pollando), D-ro J. C. Wells (Britio) kaj E. J. Woessink (Nederlando).

La Estraro estas la plenuma organo, respondeca al la Komitato, kaj prizorgas la realigon de ĉiuj ĝiaj decidoj. La Estraro nomas la redaktoron de la ĉefa organo de la Asocio kaj de la aliaj periodaĵoj, diversajn komisiitojn por apartaj taskoj. Ĝi nomas kaj maldungas la direktoron de la CO kaj la direktorojn aŭ administrantojn de eventuale aliaj oficejoj. Kvankam la direktoro de la CO nomas la geoficistojn, tamen la nomigoj estas validaj nur post la aprobo de la Estraro. La Estraro okazigas la universalajn kaj aliajn kongresojn aŭ konferencojn, kreas novajn servojn kaj aranĝojn laŭ la ĝeneralaj direktivoj de la Komitato, konsentas aŭspiciojn por aranĝoj konformaj al la celoj de la Asocio, sed ne prizorgataj rekte de kiu ajn ĝia organo. Fine, la Estraro prezentas al la Komitato proponon pri la buĝeto kaj respondecas pri la financoj de la Asocio.

La Statuto difinas la funkciojn de la prezidanto, vicprezidantoj kaj ĝenerala sekretario. La prezidanto reprezentas la Asocion kaj subskribas kun la ĝenerala sekretario la ĉefajn dokumentojn. Li prezidas la Komitaton, la Estraron kaj la kongresojn de UEA. Li kontrolas aŭ kontroligas ĉiujare la CO kaj la aliajn oficejojn. Li rajtas delegi alian komitatanon por difinita tasko. En tute esceptaj kazoj la prezidanto havas la povojn de la Estraro aŭ de la Komitato, al kiuj li, tamen, devas raporti kiel eble plej baldaŭ por aprobo.

La vicprezidantoj laŭnecese anstataŭas la prezidanton, sed povas esti ŝarĝitaj ankaŭ pri la plenumo de apartaj taskoj.

La ĝenerala sekretario zorgas pri la efektivigo de la decidoj de la Komitato kaj Estraro; kunmetas la jaran raporton pri la laboro de la Asocio kaj faras la planon por la estonta jaro; prizorgas la mondan informadon pri Esperanto kaj plenumas aliajn taskojn, kiujn la Komitato aŭ la Estraro donas al li. Laŭ la Statuto, la ĝenerala sekretario gvidas ankaŭ la eksterajn rilatojn de la Asocio, sed, same kiel en la antaŭaj Estraroj depost 1952, tiun branĉon en 1972 plu prizorgas la nuna prezidanto.

La aliaj estraranoj plenumas laŭbezone komisiitajn taskojn. La fakoj, pri kiuj aktuale respondecas la prezidanto, vicprezidantoj, ĝenerala sekretario kaj unuopaj estraranoj troviĝas sur la interna kovrilpaĝo de ĉiu numero de *Esperanto*.

La Estraro kunvenas minimume du fojojn jare: en la urbo de la UK, kiam ĝi havas 3-4 plurhorajn kunsidojn, kaj printempe en la CO dum tri tuttagaj kunsidoj. Nuntempe ĉiujare okazas 2-3 pliaj t.n. teknikaj kunsidoj inter la prezidanto, direktoro kaj kelkaj estraranoj loĝantaj en la proksimeco de la CO. Ekster la kunsidoj la Estraro estas en daŭra kontakto per multaj cirkuleroj kaj abunda korespon-

dado inter la estraranoj kaj kun la CO. Pri urĝaj proponoj, ne postulantaj longajn diskutojn, la decidoj estas farataj per skriba voĉdono.

La rolo de Estraro estas decide grava por la agado de la Asocio. De ĝia konsisto kaj de la konscienca laboro de ĉiu unuopa estrarano, precipe de la ĉefaj funkciuloj, grandparte dependas la plenumo de la laborprogramoj, planoj kaj aliaj taskoj laŭ la faritaj decidoj.

18.4.2.3 *Centra Oficejo.* — La Centra Oficejo (CO) estas la teknika-administra organo de la Asocio. Ĝi estas gvidata de la direktoro, kiu estras la tutan laboron kaj preparas la projekton de la buĝeto.

Nuntempe en la CO estas redaktataj la *Jarlibro*, la revuo *Esperanto*, diversaj bultenoj kaj aliaj publikaĵoj. Aldone al la administrado de la tuta membraro kaj delegita reto, la CO prizorgas la eldonan fakon, la libroservon, la bibliotekon kaj la publikigon de la dokumentoj de CED.

En 1968 la meritplena direktorino de la CO, M. Vermaas, eksiĝis kaj la Estraro nomis ŝin „komisiito por specialaj taskoj". D-ro V. Sadler, kiu ĝis tiam estis redaktoro de *Esperanto*, fariĝis direktoro laŭ la unuanima decido de la tiama Estraro. Li plu prizorgis la revuon kiel ĝia ĉefredaktoro.

En la CO nuntempe laboras deko da geoficistoj, kelkaj el ili nur duontage.

18.4.2.4 *Kontrola Komitato.* — Ĝi konsistas el minimume 2 personoj, kiujn la Komitato elektas inter siaj membroj por ekzameni la librotenadon kaj laboron de la CO. Ilia ĉefa tasko estas trarigardi la administradon kaj kompari la jarajn kontojn de la Asocio kun la aprobita buĝeto. En tiu laboro ilin helpas la raporto de publika, profesia revizoro (nomata de la Estraro), kiu ĉiujare detale ekzamenas la tutan librotenadon. La Komitato elektas 2 aliajn personojn por kontroli la kontojn de CED, kaj povas elekti pliajn por kontroli kiun ajn alian administran centron aŭ apartan konton, ekzemple la kongresan. La kontrolantoj ĉiujare raportas al la Estraro kaj al la Komitato. La raportoj de ĉiuj kontrolantoj kaj de la profesia revizoro estas regule publikigataj en la *Jarlibro* kune kun la financa raporto de la Estraro.

18.4.2.5 *Komisionoj kaj Komisiitoj.* — Kiel jam dirite, la Estraro povas formi apartan komisionon por daŭre prizorgi difinitajn taskojn, aŭ ĝi povas nomi nur unu personon kiel komisiiton por plenumo de laboro, kiu postulas kompetentecon kaj sindediĉon ĝuste por la koncerna afero. Nuntempe ekzistas konstantaj komisionoj por la Belartaj Konkursoj, Informa Fako, Internacia Ekzameno, Semajno de Inter-

nacia Amikeco, Kontrolo de Lernolibroj, Lingva Servo. Aliflanke, unuopaj komisiitoj estas nomitaj por Filma Servo, Fotoservo pri Zamenhof, ISU, Specialaj Taskoj, Agado en Azio kaj Afriko, Agado en Eŭropo, Aŭtomobilismo, Koresponda Servo Mondskala kaj Magnetofona Servo. Komisionoj por la Oratoraj Konkursoj estas nomataj de jaro al jaro. Listo de ĉiuj komisionoj kaj komisiitoj aperas en la *Jarlibro*.

18.4.2.6 *Delegitoj.* — La ĉefdelegitoj, delegitoj, vicdelegitoj kaj fakdelegitoj estas siaspecaj organoj de la Asocio. Tio speciale koncernas la ĉefdelegitojn aŭ perantojn kaj la delegitojn aŭ vicdelegitojn. Aldone al siaj administraj taskoj, la ĉefdelegitoj aŭ perantoj estas reprezentantoj de UEA en diversaj landoj. Aliflanke, ne nur la delegitoj kaj vicdelegitoj, sed ankaŭ la fakdelegitoj estas rigardataj kiel reprezentantoj de la Asocio en siaj respektivaj lokoj aŭ fakoj.

Ankaŭ la nombro de ĉiuj kategorioj de delegitoj konsiderinde kreskis en la lastaj 25 jaroj. En 1948, post la kunfandiĝo, UEA havis entute 2.224 delegitojn en 58 landoj; en 1972 la suma nombro estis 3.501 delegitoj en 66 landoj.

La rolo de la delegita reto de UEA kaj la multnombraj praktikaj servoj, kiujn la delegitoj daŭre plenumas, estas koncize prezentitaj en Ĉap. 12.

18.4.3 Institucioj kaj Centroj

Formale ankoraŭ ekzistas la Serva Centro kun sidejo en Svislando. Ĝiaj ĉefaj taskoj estas la administrado de la svisa poŝtkonto de UEA kaj respondado al informpetoj. Nuntempe ĝi troviĝas en Zürich, sub gvido de J. J. Sturzenegger. Alia malgranda „centro" troviĝas en Londono: la nunaj Honora Prezidanto kaj prezidanto prizorgas la t.n. Londonan Konton de UEA.

En Londono troviĝas ankaŭ la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, sed ĝia administra oficejo troviĝas en la CO en Rotterdam.

La Institucio Hodler 68 troviĝas en Nederlando. Ĝi estas memstara institucio, sed ligita al UEA. Same tiel la sidejo de la Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio troviĝas en Nederlando. Ĝi havas similan juran pozicion, kiel Institucio Hodler 68.

Fine, Internacia Somera Universitato tiel evoluis kaj establiĝis, ke ĝi povas esti rigardata kiel aparta institucio de UEA, aganta konforme al la Regularo pri ISU.

CED, ISU, Institucio Hodler 68 kaj Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio estas pli detale pritraktitaj en Ĉap. 20.

18.5 ĈEFAJ AGADOJ

18.5.1 Tri Starpunktoj

Pri la rolo de UEA ekzistis tri starpunktoj. Unuj opiniis, ke UEA estas celo al si mem, ke ĝin ne koncernas la disvastigo de la lingvo kaj la progresado de la Movado, sekve, ke ĝi estas memsufiĉa. La alia koncepto estis, ke UEA povas tute bone ekzisti eĉ sen Komitato kaj sen Estraro, kiuj estas nenecesaj balastoj, se nur ĝi havas sian oficejon, kiu eldonas la gazeton kaj la Jarlibron. Laŭ la tria opinio, la tasko de UEA devas esti ne nur doni al la membraro altnivelajn, utilajn publikaĵojn kaj maksimume vastigi la praktikajn servojn, sed ankaŭ progresigi la lingvon. Krome, UEA, kiel reprezentanto de la esperantismo en la mondo, devas unuigi ĉiujn fortojn, harmoniigi kaj kunordigi la laboron kaj klopodojn, altigi la kulturan nivelon, havigi al la lingvo kaj al la Asocio la necesan prestiĝon, aŭ malonge: sisteme organizi kaj laŭplane gvidi la neŭtralan Esperanto-Movadon.

La tria starpunkto — kvankam tio povas ŝajni tre stranga, preskaŭ nekredebla — realiĝis nur iom post iom, venkante multegajn malfacilaĵojn. El la hodiaŭa vidpunkto multaj agadoj kaj atingoj de UEA ekde 1948 prezentiĝas kiel tute naturaj, sed en la komencaj jaroj de tiu ĉi periodo ili aspektis por multaj, ankaŭ por sendube sindonaj aktivuloj, kiel nerealigeblaj. La respondo al la rezistoj estis, ke celtrafa kaj sistema laboro devos iom post iom altiri ĉiujn pozitivajn elementojn, aktivigi la organizaĵojn kaj unuopulojn; ke tio siavice kreskigos la membronombron kaj havigos al UEA financan helpon por realigo de pliaj konkretaj taskoj; ke la sukcesa plenumo de tiuj taskoj devos plu fortikigi la Asocion kaj nombre kaj materie. Laŭ tiu tria koncepto estis tute klare, ke nur per grandega fortostreĉo estos eble rompi la ensorĉitan cirklon de izoliteco, stagno, parte eĉ regreso. Ĝi fidis, ke en la Esperanto-Movado ekzistas multaj latentaj fortoj, kiuj certe manifestiĝos kiam UEA komencos efektive gvidi la Movadon, pravigos siajn agadojn per nekontesteblaj rezultoj kaj tiel klare montros, ke ĝuste tio estas la vojo, kiu kondukas al realigo de la celoj.

Tiu starpunkto montriĝis ĝusta.

La agadojn oni povas prezenti aŭ en formo de sistemigitaj grupoj aŭ kronologie.

18.5.2 Sistema Grupigo

La aktivadon de kiu ajn organizaĵo oni povas dividi en grupojn laŭ diversaj vidpunktoj. En la kazo de UEA, kaj en tiu ĉi kunteksto,

la plej logika kriterio estas rilatigi la agadojn kaj iliajn rezultojn al la taskoj en la tri ĉefaj branĉoj — informado, instruado, praktikaj servoj — konforme al la celoj-rimedoj difinitaj en la Statuto kaj detaligitaj en la aliaj fundamentaj dokumentoj. Se sistemigitaj laŭ tiu kriterio, la agadoj de la lastaj 25 jaroj estas klasifikeblaj en la sekvantaj sep ĝeneralaj grupoj:

(i) *Interna fortikigo:* solvo de la organizaj problemoj (Statuto, regularoj, programoj, planoj); modernigo de la CO; evoluigo de la universalaj kongresoj; *Jarlibro, Esperanto, Kontakto, Kongresa Libro* kaj aliaj publikaĵoj; daŭra solvado de financaj problemoj; popularigo de UEA per memorigo de datrevenoj (1958 kaj 1968), per artikoloj, prelegoj, bulteno *Informa Servo de UEA* ktp.

(ii) *Eksteraj rilatoj:* Unesko, Unuiĝintaj Nacioj, aliaj interŝtataj kaj internaciaj neregistaraj organizaĵoj; rilatoj de TEJO kun neesperantistaj junularaj organizaĵoj; diversaj kampanjoj en kunlaboro kun Unesko kaj NRO-j; partopreno en internaciaj konferencoj, organizitaj de Unesko aŭ en la kadro de NRO-j; bulteno *Unesko-Novaĵoj,* kaj tuta aro da aliaj.

(iii) *Disvastigo de la lingvo per dokumentoj kaj informado:* la tuta laboro de CED; *La Monda Lingvo-Problemo;* Informa Fako de UEA kaj IF de landaj asocioj; Principaro de Frostavallen kaj prilaboro de la unuopaj principoj; bultenoj *Internacia Gazetara Servo* (IGS), *Kongresa Gazetara Servo* (KGS), *Eltondaĵa Servo;* informado okaze de grandaj kampanjoj, k.a.

(iv) *Instruado:* kunligo de lernejoj; statistikoj de CED pri lernejoj kaj universitatoj en kiuj Esperanto estas instruata; agado de la Konsulta Komisiono pri Lernejoj kaj helpo al ILEI; *Lerneja Bulteno;* Lernejaj Konferencoj; Internacia Ekzamena Komisiono; Kontrolkomisiono de Lernolibroj; Lingva Servo; diversaj eldonaĵoj, ekz. *Privilegia Vojo, Metodiko de la Esperanto-Instruado,* k.a.

(v) *Kreo, Evoluigo kaj Vastigo de Praktikaj Servoj:* delegita reto; fakaj asocioj; fakaj terminaroj; Koresponda Servo; fakaj konferencoj kaj seminarioj; turismo kaj aŭtomobilismo; Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI), k.a.

(vi) *Kontribuo al Kultura Riĉigo de la Lingvo:* Internacia Somera Universitato; Belartaj kaj Oratoraj Konkursoj; Internacia Arta Teatro, artaj festivaloj, kuraĝigoj en la sfero de la arta kreado; Magnetofona Servo; Serio Oriento-Okcidento, propraj kulturaj periodaĵoj kaj helpo al diversaj kulturaj aranĝoj en formo de aŭspicioj kaj alimaniere, ktp.

(vii) *Progresigo de Internacia Solidareco;* programoj de UK direktitaj al tiu celo (ekz. artaj vesperoj dediĉitaj al la kongresa lando); diskonigo de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, arti-

koloj, prelegoj kaj internaciaj konferencoj pri la Homaj Rajtoj, aktiva partopreno per ampleksa programo en la Jaro de Homaj Rajtoj; agadoj laŭ specialaj planoj okaze de aliaj eventoj ekz. Jaro de Internacia Kunlaboro; memorigo de gravaj eventoj en kunlaboro kun Unesko kaj UN, Semajno de Internacia Amikeco, k.a.

La supra grupigo neniel signifas izoligon: konforme al la baza koncepto de kunligiteco kaj interdependeco, la agadoj en unu grupo helpis plurajn en aliaj grupoj.

Detaloj pri la supre menciitaj agadoj — listigitaj ĉi tie nur supraĵe kun la celo skize grupigi ilin — estas analizitaj en aliaj partoj de tiu ĉi verko. Restas nur koncize prezenti ilin en kronologia ordo por reliefigi la konstruadon de moderna UEA tavolon super tavolo.

18.5.3 Kronologia Sinsekvo

En 1949, tuj post la UK en Bournemouth, estis ellaboritaj la Regularoj pri la Internacia Somera Universitato, Belartaj Konkursoj kaj Oratoraj Konkursoj. Ekde tiam la konkursoj kaj la sesioj de ISU regule okazis dum ĉiuj UK. Estis organizita aparta Propaganda Fako, kiu poste ricevis la nomon Informa Fako (IF) de UEA. Fine de 1949 komenciĝis la granda prelegvojaĝo de Prof. I. Lapenna, kiel speciala komisiito de UEA, en pluraj landoj de Eŭropo. Ekfunkciis la Internacia Gazetara Servo, kiu seninterrompe plu laboras kaj publikigis 199 bultenojn ĝis novembro 1972. En tiu jaro UEA havis 18.749 membrojn.

En 1950 estis la unuan fojon organizita la Kongresa Gazetara Servo (KGS) dum la UK en Parizo. Ankaŭ ĝi seninterrompe funkciis dum ĉiuj UK. La laboroj de la UK estis por la unua fojo dividitaj en sekcioj. La Informa Fako de UEA vastiĝis. En tiu jaro la nombro de membroj falis al 14.711, ĉefe pro objektivaj malhelpoj pagi la kotizojn al la CO.

En 1951 finiĝis la granda prelegvojaĝo de Prof. Lapenna, komencita fine de 1949. Entute li faris pli ol 300 prelegojn en 108 urboj de Francio, Islando, Britio, Italio, Belgio kaj Nederlando. La celoj de la prelegvojaĝo — vigligo de la Movado, informado kaj konatiĝo kun la realaj eblecoj de la Esperanto-organizaĵoj — estis plenumitaj tre kontentige. Fine de 1951 realiĝis la plano pri la fondo de CED. Sentiĝis la efiko de la laboro en 1950 kaj de la transdono de la Peticio al UN. En tiu jaro UEA havis 14.943 membrojn.

En 1952 la ĉefaj eventoj estis: funkciigo de CED; granda gazetara kampanjo okaze de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo; unua kunveno de la reprezentantoj de la landaj IF en Oslo; kompletigo de la statistiko pri la Esperanto-Movado; publika debatvespero okaze de la Pariza Konferenco. La plej grava evento, tamen, estis

la decido de la Pariza Konferenco de Unesko komuniki la Peticion al la Ŝtatoj-Membroj. En 1952 la nombro de membroj estis 16.243.

En 1953 okazis grandega kampanjo por apogi la Peticion. Interalie, estis organizita speciala reto de kunlaborantoj en la Unesko-afero. Aliaj eventoj: 250-paĝa dokumento de CED sendita al la Sekretariato de Unesko; specialaj raportoj de la landaj asocioj al la Naciaj Unesko-Komisionoj kaj aliaj landaj aŭtoritatoj; dokumentita petskribo por akiro de konsultaj rilatoj kun Unesko. En 1953 la nombro de la membroj kreskis al 16.861.

La jaro 1954 estis decida por la Peticio. La ĉefaj agadoj kaj rezultoj estis: okazigo de la unua elmontro de la Universala Ekspozicio de Esperanto en Montevideo; speciala dokumento de CED en la angla, franca kaj hispana por la delegitoj en la Unesko-Konferenco; reprezentiĝo en Montevideo per observanto; organizo de monda kampanjo en la gazetaro kaj radio, kiu rezultigis milojn da artikoloj kaj informoj; konsultaj rilatoj kun Unesko, voĉdonitaj de la Ĝenerala Konferenco la 8-an de decembro; Rezolucio favore al Esperanto de la 10-a de decembro. En 1954 la membronombro kreskis al 17.001.

La jaron 1955 markas la akcepto de la nova Statuto. Aliaj eventoj: akcepto de la Unua Baza Laborprogramo; translokigo de la Oficejo al Rotterdam; pligrandigo de la nombro de geoficistoj. En 1955 la Asocio atingis 21.760 membrojn kaj tiamaniere la unuan fojon en sia historio transpasis la ciferon de 20.000.

En 1956 estis vendita la domo en Heronsgate. Aldone al ĉiuj antaŭaj agadoj, okazis jenaj pliaj ŝanĝoj aŭ plibonigoj: pli granda formato de *Esperanto;* apero de la bulteno *Unesko-Novaĵoj* (ĝis la fino de 1972 entute 60 n-roj de la bulteno, el kiu la Esperanta gazetaro publikigis 1.083 erojn, registritajn en CED); plia speciala bulteno de la IF de UEA en la angla kaj franca por la landoj sen organizita Esperanto-Movado (ĝis novembro 1972 entute aperis 68 n-roj); seslingva flugfolio pri Esperanto (pliaj eldonoj aperis poste); publikigo de prospektoj de diversaj internaciaj organizaĵoj en Esperanto; 2-a kaj 3-a elmontroj de la Universala Ekspozicio en Strasburgo kaj Kopenhago (poste okazis aliaj elmontroj); reprezentiĝo en la granda konferenco en Arnhem (Nederlando), kiu pritraktis la lingvan problemon en Eŭropo; apero en *Index Translationum* de verkoj tradukitaj en Esperanto (en la postaj eldonoj aperis pliaj informoj); diskutsemajno en Frostavallen, kiu pritraktis informadon kaj rezultigis la *Principaron de Frostavallen;* fondo de eldona fako de UEA. En 1956 UEA havis 25.171 membrojn.

La jaron 1957 markas publikigo de afiŝoj de Unesko kun teksto en Esperanto je la kostoj de tiu Organizaĵo; afiŝo de UN kun teksto



Prof. D-ro Ivo Lapenna, la konstruinto de la moderna UEA. (Foto Kehlet)

en Esperanto; fondo de Magnetofona Servo (ĝis 1972 ĝi produktis 292 programojn) kaj Koresponda Servo (entute 3.920 slipoj ĝis 1972); reorganizo de TEJO, kiu fariĝis sekcio de UEA; publikigo de *Angla Antologio;* ampleksaj preparlaboroj por la celebrado de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. En 1957 UEA havis 27.138 membrojn kaj tiel ankoraŭfoje ĝi superis sin mem.

En 1958 estis organizita la celebrado de la 50-jara datreveno de la fondiĝo de UEA: serio da artikoloj kaj brila festo kun la UK en Mainz; intensigo de la preparlaboroj por la Zamenhof-jaro; fondo de Internacia Arta Teatro kaj ĝia unua prezento dum la UK en Mainz. La membraro de UEA denove iom kreskis: 27.378.

1959 estis la Zamenhof-Jaro: impona Internacia Patrona Komitato; apartaj dokumentoj de CED en pluraj lingvoj; multaj artikoloj en la monda gazetaro kaj prelegoj aŭ informoj per radio kaj televido; artikolo pri Zamenhof en *Unesco-Courier;* Zamenhof deklarita granda personeco de la homaro fare de la Plenuma Komitato de Unesko; impona UK en Varsovio; fondo de Internacia Ekzamena Komisiono kaj Internacia Diplomo. UEA atingis 32.588 membrojn kaj tiamaniere la unuan fojon en sia historio transpasis la ciferon 30.000.

En 1960 estis plibonigita la Kongresa Regularo; UEA sendis s-inon M. Haudebine al Hindio por instrui la lingvon. Elstara evento estis la Lerneja Seminario en Bohinj, Jugoslavio. Dum la UK en Bruselo (1960) ekfunkciis la Internacia Ekzamena Komisiono kaj okazis la unua ekzameno laŭ la Regularo akceptita en Varsovio (1959). La nombro de la membroj malkreskis al 30.185 ĉefe pro valutaj malfacilaĵoj en unu lando, el kiu en la antaŭaj jaroj estis eble pagi la kotizon.

En 1961 UEA aĉetis propran domon en la centro de Rotterdam; estis lanĉita la kampanjo „Ĉambroj" (donacoj de 5.000 gld. por la rajto nomi iun ĉambron laŭ la indiko de la donacinto); Unua Internacia Arta Festivalo dum la UK en Harrogate; en la rilatoj kun Unesko UEA ricevis la prestiĝan kategorion B; akcepto de nova Regularo por la Internacia Ekzamena Komisiono plu valida. Kompare kun la pasinta jaro la nombro de la membroj kreskis al 30.750.

La jaron 1962 markas du gravaj eventoj: la plenumo de la Unua Baza Laborprogramo kaj la akcepto de la Dua Baza Laborplano de UEA; Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco, okazinta dum la UK en Kopenhago. La membronombro estis 32.475.

La jaro 1963 estis plena de novaj agadoj kaj eventoj: la UK en Sofio kun 3.472 aliĝintoj; Unua Konferenco de Lernejoj en kiuj Esperanto Estas Instruata; Dua Internacia Arta Festivalo; ekeldono de *Monda Kulturo* (regule aperadis ĝis la mezo de 1966); Jaro de la Junularo; publikigo de la epokfara traduko de *Dia Komedio* en

la Serio Oriento-Okcidento; fondo kaj ekago de Konsulta Komisiono pri Lernejoj (malfondita en 1970, post kiam ĝi plenumis sian taskon); ekeldono de la revuo *Kontakto* fare de la junulara sekcio. UEA superis ĉiujn antaŭajn rekordojn kaj atingis 33.953 membrojn; fondo de Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI).

En 1964 komenciĝis la ampleksaj preparlaboroj por la Jaro de Internacia Kunlaboro (JIK); pli ol 300 kvalifikitaj personoj kandidatigis la Asocion por la Nobel-Pacpremio (multaj informoj en la monda gazetaro); UEA transprenis la revuon *La Praktiko* (kaj eldonis ĝin ĝis 1971, kiam, laŭ la insista deziro de Andreo Ĉe, UEA redonis ĝin al la antaŭaj proprietuloj, kio bedaŭrinde signifis la finon de tiu grava periodaĵo). La nombro de la membroj falis al 32.202.

En 1965 estis la Jaro de Internacia Kunlaboro: UEA partoprenis per ampleksa programo, en kiu la Propono al UN okupis la unuan lokon; kolektado de individuaj kaj kolektivaj subskriboj progresis amase; la UK en Tokio, la unua en lando de Azio, kun 1.711 aliĝintoj el 45 landoj, estis grandega sukceso. La nombro de membroj estis 31.927.

La jaron 1966 markas pluraj gravaj eventoj: oficiala transdono de la Propono al UN kun akompanaj Memorando en 4 lingvoj, listo de la plej gravaj individuaj subskribintoj kaj organizaĵoj, aparta dokumento de CED k.a.; UK en Budapeŝto kun 3.945 aliĝintoj el 41 landoj; Tria Arta Festivalo; Dua Lerneja Konferenco en Graz, Aŭstrio; kongreso de TEJO en Pécs kun rekorda nombro de 900 partoprenantoj; prelegoj de la prezidanto en Hungario, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Usono, Nederlando, Germanio kaj Soveta Unio (1967). Malgraŭ la iom altiĝintaj kotizoj la nombro de membroj kreskis al 32.507.

En 1967 komenciĝis la preparlaboroj por la Jaro de Homaj Rajtoj (JHR) kaj aperis la 2-a eldono de la Universala Deklaracio. La nombro de membroj estis 32.157.

La jaron 1968 markas jenaj okazaĵoj: plena realigo de la plano por memorigo de la JHR, 3-a kaj 4-a eldonoj de la Universala Deklaracio; glumarko en 80.000 ekzempleroj kun la vortoj „Por la Internacia Lingvo — Kontraŭ la Lingva Diskriminacio — Jaro de Homaj Rajtoj"; memorigo de la 60-jara datreveno de la fondiĝo de UEA; fondo de Institucio Hodler 68; aperigo de la unua numero de *La Monda Lingvo-Problemo;* Pedagogia Konferenco en Sonnenberg pri „Fundamentaj Homaj Rajtoj kaj Liberecoj" sub aŭspicio de UEA; partopreno en la Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj en Parizo kaj amendo de UEA al Procedura Regularo por pli justa uzo de lingvoj; Kvara Internacia Arta Festivalo en Madrido; Unua Se-

majno de Internacia Amikeco (post tio ĝi okazis ĉiujare); publikigo de la bulteno *Informa Servo de UEA* (ĝis novembro 1972 entute aperis 27 n-roj). CED ŝanĝis la nomon al Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo. La nombro de membroj kreskis al 32.380.

En 1969 okazis la Tria Lerneja Konferenco en Helsinki, Finnlando. La aliaj menciindaj eventoj estas: Laborplano por la Internacia Jaro de Edukado; enkonduko de „Debato" kiel nova ero de la kongresaj programoj; perspektiva plano por ekipi la CO per ĉiuj rimedoj por la presado de malgrandformataj eldonaĵoj: kompostmaŝino, fotografa aparataro, ofseta presmaŝino. La nombro de membroj denove kreskis al 33.769, la dua plej alta en la historio de UEA.

En 1970 estis preskaŭ komplete realigita la perspektiva plano por la produktado de la eldonaĵoj de UEA en la CO: aĉeto de kompostmaŝino kaj fotografa aparataro; ekpreso de la *Jarlibro, Esperanto, Kontakto,* multaj dokumentoj de CED kaj aliaj presaĵoj per la novaj maŝinoj; aĉeto de moderna librotena aŭtomato kun kontrolita aŭtomata saldo-kalkulado; kolekto de 8.500 gld. por la ilaro, t.e. unu triono de la kostoj por aĉeti la kompostilon kaj fotografan aparataron; rearanĝo de la *Jarlibro* proksimume en du egalaj partoj; eldono de la libro *Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj* de Mag. I. Dratwer; komenciĝo de artikolserio „Por pli Efika Informado" en *Esperanto;* sukcesa Internacia Jaro de Edukado; fakaj prelegoj de Prof. I. Lapenna en finnaj universitatoj en Esperanto kun nacilingva tradukado; brila UK en Vieno, kiun persone malfermis la Prezidento de Aŭstrio F. Jonas. Pro la inflaciaj prezoj en 1969 necesis denove iom altigi la kotizojn, kio parte reflektiĝis en la nombro de membroj: 33.337.

La jaron 1971 markas jenaj okazaĵoj: akcepto de la amendo al la Procedura Regularo de NRO-j, konforme al la klopodoj de UEA iniciatitaj en 1968; nova eldono de la faldfolio *La Internacia Lingvo Esperanto;* nova eldono de internaciaj afiŝoj; Laborplano por la Internacia Libro-Jaro kaj eldono de glumarko en 80.000 ekzempleroj; daŭrigo de la artikolserio „Por pli Efika Informado" kaj projekto eldoni la tuton en formo de broŝuro; brila „Forumo" dum la UK en Londono, publikigo de la materialoj en LMLP 9/1972 kaj depresaĵo en formo de 48-paĝa broŝuro en 1.000 ekzempleroj kun la titolo *La Demando de Lingva Komunikado en la Nuntempa Mondo;* kampanjo 100 × 100 kun la celo atingi, ke 100 personoj pagu dum 3 jaroj po 100 gld. jare por kovri la elspezojn de altigita afranko (grandparte sukcesinta). Por la unua fojo post multaj jaroj la finaj kontoj de la Asocio montris malgrandan profiton de 3.100 gld., ĉefe dank' al la produktado de la presaĵoj per la maŝinoj aĉetitaj en 1970. La nombro de membroj estis 32.070.

1972 estas la Internacia Jaro de la Libro, en kiu UEA partoprenas per speciala konciza plano kun emfazo je la valoro de la Esperanta Literaturo kaj propagandado de la Esperanta Libro; plua evoluigo de la Libro-Servo de UEA; luo de la plej moderna fotokopiilo; komenciĝo de Eltondaĵa Servo; UK en Portland, la unua en Usono post 1915, kun elstara programo; seminario Sveda Somera Semajno en Frostavallen (daŭrigo de la diskutoj pri „La Problemo de Lingva Komunikado en la Moderna Mondo — Kun Speciala Atento al la Situacio en Eŭropo" kaj „Perspektivoj de Esperanto kaj la Vojoj por la Estonta Agado", alivorte la ĉefaj principoj de la Tria Baza Laborprogramo, decidita en 1971 kaj ellaborata en 1972); Hungara Kultura Festivalo en Budapeŝto kaj Dekjara Jubileo de Somera Esperanto-Universitato en Gyula, Hungario, ambaŭ sub aŭspicioj de UEA; kongreso de TEJO en Toruń, Pollando. Dum tiuj ĉi linioj estas skribataj, la jaro 1972 ankoraŭ ne finiĝis, sed ĉio indikas, ke la nombro de individuaj membroj kreskos kompare kun la pasinta jaro, verŝajne ankaŭ la nombro de la tuta membraro.
(Lastmomente: Efektive, la nombro de IM kreskis al 7.069 kaj tiu de la tuta membraro al 32.459.)

18.5.4 Komento

Multnombraj estis la taskoj, kiujn frontis UEA inter 1948 kaj la fino de 1972. La rezultoj estas des pli rimarkindaj. La plenumado de la taskoj per paralelaj agadoj en diversaj direktoj rezultigis internan fortikigon de la Asocio, konsiderindan altigon de ĝia reputacio en la internaciaj rilatoj, kaj ĝeneralan plibonigon de la pozicio de Esperanto en la mondo. Sukcese estis solvitaj multaj internaj kaj eksteraj problemoj en tre malfacilaj cirkonstancoj. Ĉiu unuopa el la multfacetaj agadoj — kaj multaj aliaj, malpli gravaj, eĉ ne aluditaj en la supra listo — postulis amason da tempo, energioj, konvinko kaj fido. Aldone, necesis ankaŭ havigi almenaŭ la minimumajn financajn rimedojn, sen kiuj la agadoj ne estus realigeblaj.

18.6 FINANCA FORTIKIĜO

Ekde sia fondiĝo UEA preskaŭ senĉese havis deficitojn. Tio estas sufiĉe komprenebla, se oni konsideras, ke efektive la Asocio ĉiam pli donadis al la membraro, ol ĝi ricevadis en formo de kotizoj. Tio precipe koncernas la traktatan periodon, dum kiu UEA ludis decidan rolon en la disvastigo de la lingvo. Nur financa helpo de pli bonstataj kaj klarvidaj membroj ebligadis kovri la deficitojn kaj finance vivteni la Asocion. La demando estas kiel: ĉu racie aŭ malŝpare. Jen

karakterizaj ekzemploj:

Inter 1920 kaj 1933, kiam la sidejo de UEA estis en Ĝenevo kaj kiam ekzistis preskaŭ neniaj malfacilaĵoj por pagi la kotizojn de kiu ajn lando al la Centra Oficejo, la tuta sumo de malprofitoj estis 120.000 sv.fr. (oni konsideru la tiaman valoron de la franko). La plia sorto de la ĝeneva UEA estas konata, kaj ne necesas plu komenti ĉi tie. La deficitoj de Internacia Esperanto-Ligo, ekde 1947 denove UEA, en Heronsgate, variis de jaro al jaro. En tiu periodo la agadoj de UEA estis limigitaj kaj la nombro de ĉiuj membroj multe pli malalta ol nuntempe. Ankaŭ tiam necesis kovri la deficitojn el la kapitala konto, kaj ankaŭ tiam la situacio estis malfacila, sed ne komparebla kun la ĝeneva periodo.

Ekde la fino de 1955 la sidejo de UEA troviĝas en Rotterdam. La agadoj de UEA senĉese vastiĝadis, kaj la nombro de la membroj kreskadis, kiel montrite en la antaŭa sekcio. Por kovri la deficitojn necesis denove prenadi el la kapitala konto. Nur escepte la financa jaro finiĝis sen malgajno.

Estas pli ol evidente, ke la ŝlosilo por objektive taksi la financan situacion estas precize la kapitala konto kaj la diversaj fondaĵoj, ĉu konstantaj, ĉu okazaj por difinitaj kampanjoj.

En 1948 la kapitala konto estis 1.300 anglaj pundoj, la valoro de la domo en Heronsgate estis taksita je 2.000 pundoj kaj la tiama Fondaĵo Hodler en Ĝenevo estis 17.500 sv.fr., sed nur teorie, ĉar poste montriĝis, ke ankaŭ tiu cifero estis malĝusta. Tamen, por la bezonoj de la nuna ekspliko oni prenu ĝin kiel ĝustan. Entute, do la kapitala valoro estis ĉ. *50.000 ned. gld.* (Tiuj kaj la sekvantaj ciferoj estas rondigitaj).

En 1955, do en la jaro de la nova Statuto, la kapitala konto estis ĉ. 21.000 gld., la nova Garantia Fondaĵo estis ĉ. 55.000 gld., la Fondaĵo Hodler 15.500 sv.fr., dum la domo en Heronsgate estis vendita por la sumo de 4.150 pundoj kaj, post la pago de la kostoj kaj diversaj fakturoj, restis la sumo de 3.000 pundoj. Entute, do, egalvaloro de ĉ. *121.000 gld.*, kio signifas 71.000 gld. pli ol en 1948, malgraŭ la deficitoj kaj la grandaj kostoj de translokiĝo el Britio al Nederlando.

En 1964, nome en la jaro de la kongreso en Hago, la tuta asocia kapitalo estis *204.000 gld.*, kaj en ĝi estis inkluzivitaj la antaŭaj apartaj fondaĵoj (Garantia, Hodler, Domo, Kapitala Konto), nun unuigitaj.

En 1969 la asocia kapitalo estis *241.000 gld.* Do, dank' al pliaj heredaĵoj kaj libervolaj donacoj, ĝi denove kreskis kompare kun 1964 kaj preskaŭ duobliĝis kompare kun 1955.

En 1971, la lasta financa jaro pri kiu eblas doni informojn en la nuna momento (novembro 1972), la asocia kapitalo estis *254.000*

gld. Do, ĝi denove kreskis kompare kun 1969 kaj pli ol duobliĝis kompare kun 1955. Fakte, la kapitalo, kune kun la diversaj fondaĵoj — kaj ankaŭ ilin oni devas kalkuli — sumiĝis je 303.000 gld. Krome, en la bilanco la valoro de la domo de UEA en Rotterdam estas taksita je 137.000 gld. (kiu sumo ne eniras en la rubrikon „asocia kapitalo"), sed la fakta valoro nur de la grundo, senkonsidere al la valoro de la konstruaĵo, estas nun ĉ. 190.000 gld., kio signifas ke la domo valoras minimume 250.000 gld. Fine, ekster la financoj de UEA, oni ne povas ne emfazi la grandan signifon de Institucio Hodler 68, kiu en 1972 atingis la sumon de 143.500 gld. kaj jam povis helpi rekte aŭ malrekte al UEA per profito de ĉ. 7.000 gld. en 1970 kaj per 7.000 en 1971.

Neniam en la tuta historio de UEA — eĉ ne en la tempo de la grandega heredaĵo, kiun postlasis al la Asocio ĝia fondinto H. Hodler kaj kiu estis elspezita en nuraj kelkaj jaroj — la financa situacio de UEA estis pli bona kaj pli solida ol ĝi estas nuntempe.

Kion ĉio-ĉi signifas? Kiel povis okazi, ke, malgraŭ la bedaŭrinde ne eviteblaj deficitoj en multaj financaj jaroj (ĉefe pro la inflaciaj prezoj, malantaŭ kiuj postrestis la kotizoj), tamen tiu rezerva kapitalo, diference de la katastrofa ĝeneva periodo, daŭre kreskis kaj, kompare kun 1948, proksimume dekobliĝis (se oni prenas en konsideron ankaŭ la valoron de la domo de minimume 250.000 gld.)?

Objektiva analizo de faktoj montras, ke tio ŝuldiĝas unuavice al la trafa kaj efika laboro de la Asocio dum 25 jaroj, unuflanke, kaj al aprezado de tiu laboro fare de multaj pli bonstataj membroj, kiuj ĝuste tial helpis la agadojn de la Asocio per donacoj, ĉu por la kapitala konto, ĉu por specialaj celoj, aŭ heredigis al UEA partojn de siaj havaĵoj, aliflanke. Al la solida financa situacio certe kontribuis ankaŭ diversaj financaj iniciatoj de la Estraro, kies alvokoj havigis al la Asocio konsiderindajn sumojn, ekzemple, tute ronde: 65.000 gld. por la „ĉambroj", preskaŭ 20.000 gld. por la revuo *La Monda Lingvo-Problemo*, ĉ. 34.000 gld. por CED en 22 jaroj, pli ol 12.000 gld. por la propra presejo, ĉ. 140.000 gld. da donacoj kaj pruntoj por Institucio Hodler 68, ktp. Tiuj kaj multaj aliaj alvokoj restus senefikaj, se la membraro ne estus kontenta pri la multflankaj agadoj de UEA, kutime celtrafaj kaj ĉiam utilaj; se ĝi ne fidus je la gvidado kaj administrado de la Asocio; se ĝi ne vidus, ke la iniciatintoj ne nur alvokas la aliajn kontribui por difinitaj celoj, sed ankaŭ mem, kiel la unuaj, reagas je la propraj alvokoj per propraj kontribuoj kaj poste mem maksimume dediĉas siajn fortojn por fakte realigi la promesojn. Eble tiu konscienca plenumado de promesoj pri konkretaj atingoj, se oni finance subtenos difinitan agadon, estis unu el la ĉefaj psikologiaj faktoroj, kiuj kuraĝigis la membraron kontribui.

Estas pli ol evidente, ke ankaŭ la sukcesa financa fortikigo de UEA estas nedisigeble ligita al la agadoj, fakte integra parto de la tuta aktivado.

18.7 RESUMA TABELA TRARIGARDO

Jaro	Asocioj				Membroj		Delegitoj		Komitato			
	Aliĝintaj LA	Aliĝintaj FA	Kunlaborantaj FA	ENTUTE	Nombro	En landoj	Nombro	Landoj	Komitatanoj	Observantoj	Entute	Asocia kapitalo en ned. gld.
1948	19*	—	7	26	17.707	70	2.224	58	35	—	35	50.000
1955	22	—	12	34	21.762	81	2.249	61	40	—	40	121.000
1964	29	2	18	49	32.202	83	3.433	58	67	5	72	204.000
1971	34	3	23	60	32.070	88	3.501	66	72	6	78	254.000**

*) Sen du landaj asocioj en Jugoslavio, kiuj en la postaj jaroj estis reprezentitaj en UEA de JEL.
**) V. aldonajn eksplikojn supre en 18.6 por la jaro 1971.

La supra trarigardo resumas per informoj esprimeblaj cifere nur la nombran kreskon, teritorian etendiĝon kaj financan fortikiĝoŋ de la Asocio ekde 1948 (unua jaro post la kunfandiĝo) kaj 1971 (la lasta, pri kiu eblas doni informojn) en intervaloj de la unuaj 7, mezaj 9 kaj lastaj 7 jaroj. En la lasta 7-jara periodo aparte ĝenaj estis la eksteraj malfacilaĵoj, prezentitaj en la Enkondukaj Rimarkoj (v. 18.1), tute speciale la inflacio kaj transpagaj obstakloj el multaj landoj.

18.8 KONKLUDA RIMARKO

Eĉ pli ol supraĵa analizo de la prezentitaj faktoj montras kun absoluta certeco, ke la ĝenerala fortikiĝo de la Asocio kaj la konsiderinda pliboniĝo de la pozicio de Esperanto en la mondo estas rekta rezulto de la laboroj, kiujn plenumas UEA. Aliflanke, la centraj organoj de la Asocio povas des pli sukcese aktivi, ju pli granda

estas la apogo de ĉiuj organizaĵoj kaj unuopaj membroj, apartenantaj al ĝi.

Estas ankaŭ tute certe, ke la sukcesoj povus esti multe pli grandaj, se la aliĝintaj asocioj kaj ĉiuj individuaj membroj sindone plenumus la libervole akceptitajn sindevigojn en la Statuto, Regularoj, Laborprogramo kaj specialaj planoj; krome, se ĉiuj aliĝintaj asocioj kaj organizaĵoj en kontraktaj rilatoj kun UEA mem planadus siajn proprajn agadojn, efektive laborus laŭ tiuj planoj kaj atingus adekvatajn rezultojn.

Kvankam la prestiĝo de UEA kaj de la lingvo sendube kreskis en la lastaj jaroj, kvankam la nombro de personoj uzantaj la Internacian Lingvon grandiĝis, tamen estas ankoraŭ rimarkeblaj multaj signoj de esotereco kaj foresto de interna demokrateco kun memdisciplino, kiuj almenaŭ parte paralizas la atingojn. Aldoniĝas ankaŭ gravaj misprezentoj kaj pli ol senbazaj kritikoj, direktitaj ne al eraroj, mankoj kaj neniofarado, sed ĝuste al pozitivaj agadoj kaj atingoj. Kiel en la pasinteco, tiaspecaj misprezentaj „kritikoj" venas de personoj aŭ etaj grupoj, kiuj mem praktike neniom helpas en kiu ajn senco al progresigo de la Internacia Lingvo. Tiu negativismo ne meritus eĉ mencion, se ĝi ne disrompus la konkordon kaj dissemus defetismon. Negativajn fenomenojn la Asocio devos kontraŭbatali ankaŭ en la estonteco.

Unu el la psikologiaj problemoj, kiujn frontas UEA kaj la tuta Esperanto-Movado nuntempe, estas kiel atingi sindonon sen fanatikeco, firman konvinkon sen ĝena altrudado, fidon bazitan sur objektiva, scienca analizo de faktoj, sen tro da eksteraj signoj. Per bona volo ankaŭ tio estas solvebla.

La esperantismo estas movado ankoraŭ batalanta. Kiel tia ĝi daŭre bezonas novajn inspirojn kaj vastan subtenon. Oni ĉiam memoru, ke UEA estas nek sole la Estraro, nek nur la Komitato, nek la diversaj oficejoj, sed ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj, lokaj societoj, delegitoj, la tuta membraro, ĉiuj organoj. Kiam oni plene komprenos tiun veron kaj kiam oni agos memdiscipline laŭ la Statuto kaj regularoj, laŭ la programoj kaj planoj de laboro, konforme al la interkonsentitaj sindevigoj, UEA povos konduki la Internacian Lingvon antaŭen ankoraŭ multe pli rapide kaj pli sukcese en la sekvanta periodo. Dank' al la penadoj de pluraj sindonaj funkciuloj, libere elektitaj al la centraj organoj de la Asocio, dank' al multnombraj kunlaborantoj kaj aktivuloj tra la mondo, UEA prezentiĝas fine de 1972 kiel fortika moderna konstruaĵo. Dudek kvin jaroj estis bezonataj por ĝin konstrui tavolon post tavolo. Nun estas multe pli facile ĝin plu konstruadi, daŭre adaptante ĝin al la aktualaj postuloj de la moderna vivo. Oni tamen ne forgesu, ke eĉ la plej bela kaj

fortika konstruaĵo, kiun planis kompetentaj arkitektoj kaj realigis multaj inteligentaj cerboj kaj diligentaj manoj, povas facile esti forblovita en aeron per same modernaj eksplodigiloj dum nuraj kelkaj sekundoj, se oni ne gardas ĝin atente.

18.9 ESENCA BIBLIOGRAFIO

Lapenna, Ivo, *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*. Rotterdam 1966.
— *La Internacia Lingvo (Faktoj pri Esperanto) (red.)*. Londono 1954.
— *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro (red.)*. Londono 1960.

Periodaĵoj kaj dokumentoj:

Dokumentoj de CED, precipe en la serioj C kaj I.
Esperanto, 1948-1973, precipe por la jaroj 1948-49, 1952-57, 1962-65, 1968-73.
Jarlibroj de IEL (1945-47) kaj UEA (1933, 1934, 1948-1973).
Protokoloj pri la kunsidoj de la Komitato kaj Estraro de UEA, 1947-1973.
Raportoj de la Estraro, 1948-1972.
Statutoj de 1908, 1933 (Kolonja Interkonsento), 1936 (IEL), 1948 (kunfandiĝo), 1955 (reformo), 1956 kaj 1958 (jura personeco).

ĈAPITRO 19

LABORISTA ESPERANTO-MOVADO

19.1 ANTAŬ LA UNUA MONDMILITO

19.1.1 Esperanto kaj Laboristoj

„Uzado de la internacia lingvo Esperanto en la oficialaj sciigoj de la Internacia Socialista Oficejo" en Bruselo apartenis al la temoj proponitaj por pridiskuto dum la Internacia Socialista Kongreso en Stuttgart (1907). Submetis ĝin — laŭ komisio de sia partio — i.a. la brila franca socialisto Jean Jaurès. Kvankam la propono ne penetris en la kongresan tagordon, ĉar prepara kunveno malakceptis ĝin „kiel ne sufiĉe maturan", la jaroj 1907/08 tamen signifas turnopunkton en la sintenado de la laboristoj al la dudekjara lingvo Esperanto.

En sia frua epoko Esperanto trovis parolantojn unuavice inter rusaj kleraj idealistoj, altiritaj al ĝi per sia estetika sento kaj dorlotantaj ĝin „kiel internan apartenaĵon de sia idearo" (Drezen); inter francaj intelektuloj, metantaj per sia sistema propagando solidan fundamenton por la studado kaj praktika ekuzo de la lingvo kaj ne aparte entuziasmaj pri popularigo de homamo kaj pacifismo; poste inter diverslandaj instruistoj, kuracistoj, oficistoj, sed apenaŭ inter laboristoj. La malfermiĝo de la Esperanto-Movado al la laboristaro, al la amasoj, koincidis kun la sukcesa trapaso de la interna krizo de 1907/08, kiam la adeptoj de Esperanto triumfis kontraŭ la reformemuloj kaj kiam la lingvo perdis siajn logikistojn kaj filozofojn, kiuj bremsis ĝian eniron en la praktikon kaj la transformiĝon de lingvo-projekto al viva lingvo. Tiu ĉi venko de meztavolaj homoj,

plejparte sendanĝeruloj, kolektantoj de poŝtmarkoj kaj „esperantaĵoj", por la ekstera publiko iom strangaj personoj, ne volantaj ŝanĝi la instrumenton, kiun ili alproprigis al si kaj kiun ili opiniis tute taŭga por siaj limigitaj celoj — tiu sukcesa ribelo, do, de ĝenerale inerta anaro kontraŭ la plimulto de la gvidantoj; krome, la financa konsidero de la eldonistoj, kiuj ne volis perdi la monon investitan en esperantlingvaj eldonaĵoj; kaj, eble plej grave, la montriĝonta fakto, ke Ido efektive estas lingvo malsupera al Esperanto: jen la antaŭkondiĉoj por la penetro de Esperanto en la pli vastan socion, inaŭgurantaj tian vojon al fina venko, kian la tiutempaj „oficialaj optimistoj" ne konsideris en siaj paroladoj. Nur post kiam Esperanto pruvis, ke ĝi eliris la stadion de nura projekto, kiam ĝi montris sian ligitecon al nesplitebla homa kolektivo, ĝi ankaŭ povis pli profunde ĉerpi el la laborista potencialo. Batalantoj por sia socia kaj politika emancipiĝo posedis tre realisman juĝkapablon pri kio helpas atingi iliajn celojn. Tiel longe, kiel la lingvo de Zamenhof ne konvinke demonstris sian vivpovon, ĝi ne sukcesis altiri la internaciisman laboristan movadon, en kies ĉiutaga lukto Esperanto ne ŝajnis kapabla ludi efikan rolon, krom eble hobian. Sed nun, kiam la esperantistoj definitive transiris al la praktika elprovado de sia lingvo kaj ĉesigis la lacigan diskuton pri tiuj aŭ aliaj ŝanĝoj, al la pure poresperanta agado, ankaŭ sub influo de la Bulonja Deklaracio, aldoniĝis nova tendenco, kiu akcentis peresperantan laboron kaj celis uzi la Internacian Lingvon en speciala fako aŭ por specialaj bezonoj, eĉ se provizore nur en tre limigita kadro. Kaj ĉar laboristoj kutime partoprenis la socian vivon en organizoj apartigite de aliaj sociaj klasoj, la propagando por Esperanto inter laboristoj promesis plej fruktodonan rezulton, se ĝi estis efektivigata pere de specialaj laboristaj Esperanto-organizaĵoj.

Tiu nova tendenco, fine ebligita post la Ido-krizo kaj paralele evoluanta kun la malfortiĝo de la pridisputata kaj neklare formulita idealismo, tamen ne estis inventaĵo de laboristoj: en la Esperanto-Movado mem la fondo de UEA en 1908 indikis la estontan vojon; al la ĉefe disvastiga kaj instrua laboro Hodler kaj liaj amikoj apudmetis tutmondan organizaĵon, sendependan de naciaj societoj, por la praktika aplikado de Esperanto. Ĉirkaŭ la sama tempo montriĝis la unuaj signoj de la laŭklasa diferenciĝo en la Movado: kunveno de socialistoj dum la Universala Kongreso en Dresden (1908) akceptis proponon fondi Socialistan Societon Internacian Esperantistan, kaj, hazarde, samjare aperis en Ĉikago Esperanta traduko de la Komunista Manifesto, kies vokon „Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!" kreskanta nombro da laboristoj komencis plenigi per aldona, tute aparte inspira signifo.

19.1.2 Unuaj Organizaj Provoj

Laboristaj grupoj kreiĝis jam en la unuaj jaroj de la dudeka jarcento, i.a. Brita Ligo de Socialistaj Esperantistoj (1909), lokaj kluboj en Francio (1905), en Nederlando (1907), en Germanio (1908) kaj en Svedio (1905). Komence de 1907 aperis la unua numero de *Internacia Socia Revuo* (ISR), konceptita kiel „organo batalema", informilo pri la internacia socialista movado kaj libera tribuno de ĉiuj esperantlingvaj socialistoj kaj liberecanoj, anarkistoj kaj liberpensuloj; ĝi, krome, eldonis tradukitajn verkojn de teoriistoj de la laborista movado, i.a. de W. Liebknecht, Lassalle, Kropotkin. Sinsekve aperante en Parizo, Hago kaj Amsterdamo, ISR sukcesis konservi monatan ritmon ĝis la eksplodo de la Mondmilito, kiam ĝi havis pli ol 600 abonantojn en ĉiuj mondopartoj.

Inter la iniciatintoj de ISR[1] troviĝis la samaj personoj, kiuj en 1906 fondis en Parizo la unuan internacian laboristan Esperanto-organizaĵon, sub la nomo *Internacia Asocio „Paco-Libereco"*. Laŭ sia statuto, ĝi celis batali kontraŭ militarismo, kapitalismo, alkoholismo, kontraŭ dogmoj kaj antaŭjuĝoj kaj por socia plibonigo. Kvankam la asocio eldonis sep broŝurojn kun kontraŭmilita enhavo, ĝia reeĥo ekster Francio restis limigita. Ĉu tial, ĉar ĝi dediĉis sin al tro ambiciaj taskoj aŭ tial, ĉar la laboristaj esperantistoj ankoraŭ komprenis la lingvon pli celo ol rimedo, post 1910, kiam „Paco-Libereco" kunfandiĝis kun alia grupeto al *Liberiga Stelo*, okazis baldaŭa malaktiviĝo kaj tute ĉesis la eldona agado.

En nacia kadro la aktiveco de laboristaj esperantistoj ŝajnis pli promesplena ol sur internacia nivelo: En Germanio ekfloris laboristaj kluboj en kelkaj grandurboj, el kio en 1911 rezultis la fondiĝo de Germana Laborista Esperanto-Asocio. La 1-an de majo 1911 oni kreis Nederlandan Federacion de Laboristaj Esperantistoj, kaj en 1913 estis starigita Hungaria Esperantista Societo Laborista. Asocioj de socialistoj kaj sindikatistoj estiĝis en Francio (1910/11), poste Franca Laborista Esperantista Unuiĝo (1914); en 1912 ekaperis *Le Travailleur Espérantiste* (Esperantista Laboristo), kies tradicion ĝis hodiaŭ daŭrigas *Sennacieca Revuo*. En antaŭrevolucia Ruslando kompreneble ne povis funkcii aparta movado de laboristoj, sed ĉar ankaŭ tie ISR kaj Liberiga Stelo kolektis adeptojn, la cara *Ohrana* trovis necesa dungi specialajn agentojn por observi la esperantistojn. — „Grupo Libertaria Esperantista" en Tokio estis en 1908 organizita de la fama japana anarkisto Osugi sakae, kaj en 1913 lia ne malpli

[1] Inter ili troviĝis ankaŭ la franca anarkisto Paul Berthelot (1881-1910), kiu en 1905 fondis la revuon *Esperanto*, posta organo de UEA.

fama ĉina samcelano Sifo lanĉis dulingvan gazeton *La Voĉo de la Popolo*, kiu apud *Hina Socialisto* iom influis la ankoraŭ malfortan revolucian movadon en Ĉinio.

Aparte atentinda estis la aktiveco de Ĉeĥoj. En 1911 formiĝis en Prago socialdemokrata Laborista Asocio Esperantista, kies organo *La Kulturo* proklamis sloganon, kiu post la milito fariĝos la baza konvinko de la plej multaj laboristaj esperantistoj: „Unue ni estas socialistoj, poste esperantistoj!" Akre kritikante la banalan trapason de la neŭtralaj kongresoj, *La Kulturo* alvokis al „renaskigo de esperantismo per socialismo" kaj tre klare difinis kiel sian unuan celon la praktikan eluzon de Esperanto en la servo de internacia socialismo.

19.1.3 Projektoj de Internacia Organizaĵo

La ĝenerala socialisma movado, nome la Dua Internacio kaj la naciaj partioj, tiutempe pli-malpli ignoris Esperanton kaj okaze eĉ malpermesis al sia gazetaro skribi pri ĝi. Praktike forgesitaj estis du kongresaj rezolucioj de la Unua Internacio el la jaroj 1866 kaj 1867, kiuj esprimis sian simpation al kreintoj de internacia lingvo kaj konstatis, „ke internacia lingvo kaj la reformo de la ortografio estus ĝenerale utilaj kaj povus kontribui baldaŭ al la interfratiĝo de la nacioj". Kaj la komentoj de Marx pri la problemo de universala lingvo — li kritikis la „laikan laboron" de Proudhon sur tiu kampo — estis tro flankaj por doni impulson al liaj disĉiploj.

El la projektoj por internacia organizaĵo, kiujn diskutis la Kongresetoj de Ruĝuloj, ekde 1906 kelkfoje okazantaj en la kadro de la Universalaj Kongresoj, plej grandan atenton meritas tiu pri Internacia Laborista Federacio Esperantista, kiun submetis la ĉeĥa Laborista Asocio Esperantista, en 1912.

Dum germana projekto parolis ne nur ne pri klasbatalo, sed eĉ antaŭvidis por la organizaĵo neŭtralan karakteron, eble sub la influo de la agitado de germanaj gazetoj, kiuj insultis Esperanton kiel „kontraŭnaciecan kreaĵon" (unu gazeto jam en 1905 nomis ĝin „internacia anarkista lingvo"), la Ĉeĥoj planis allasi nur tiujn membroasociojn, kiuj laboras por Esperanto „por prepari per ĝia helpo la vojon al sociala revolucio", kaj akcentis la principojn de absolute libera aŭtonomio (1) de laboristoj de ĉiu nacio resp. lingvo kaj (2) de ĉiu memstara socialisma skolo.

Neniu projekto povis esti realigita tiam, sed la ĉeĥa starpunkto plej multe similis postmilitajn principojn de la laborista Esperanto-Movado. Eĉ se la pafado de kanonoj nun dum kvar jaroj superbruis la diskutojn inter la laboristaj esperantistoj, la direkto de

ilia agado estis surprize klare destinita. Kvankam UEA en 1911 starigis propran laboristan fakon (kiu cetere apenaŭ funkciis), la plimulto de la laboristaro jam uzanta Esperanton konsideris daŭran kunlaboron kun la neŭtralaj organizaĵoj jam kiel nerealan alternativon. Ilin fortimigis la samideana etoso, la Majstro-kulto, la kantado de „naiva" himno kaj la evidenta malinklino de multaj esperantistoj sekvi la vojmontrajn ideojn de Zamenhof, Hodler kaj aliaj progresemaj reprezentantoj de la tradicia esperantismo. Dum unu landa asocio deklaris sin malfermita kaj al pacifistoj kaj al ŝovinistoj, Hodler en letero al Romain Rolland bonvenigis la aliĝon de internaciistoj, pacifistoj kaj socialistoj, ĉar Esperanto „povas nur venki de la agado de malplimultoj profunde konvinkitaj pri internaciisma idealo".

Zamenhof, kiel Hodler ne plu kalkulante pri registaroj, montris — en la 6-a Kongreso en Washington en 1910 — kiel plej kredeble atingi la celon: ne per fido al registaraj dekretoj aŭ delegitaraj decidoj, sed „per laborado de homoj privataj, t.e. de la popolaj amasoj". La iniciatinto de Esperanto, kiu dum sia tuta vivo „amis la popolon laboreman kaj .... preferis loĝi en kvartaloj ĝiaj, for el mondana societo" (Privat), komprenis, ke ĉiu lingvo kaj do ankaŭ Esperanto ne estas disigebla de la medio kaj socio, en kiu ĝi estas uzata, kaj ke por sukcese disvastigi Esperanton necesas ligi ĝin al tiuj sociaj elementoj, kiuj estas plej multnombraj kaj kiuj povos doni plej fortan bazon kaj stimulon al la tuta internacilingva Movado. Tion li brile formulis en saluta letero al nova laborista Esperanto-gazeto, en 1910: „La kampo, kiun Vi elektis por Via laborado, estas tre grava; eble por neniu en la mondo nia demokrata lingvo havas tian gravecon, kiel por la laboristoj, kaj mi esperas, ke pli aŭ malpli frue la laboristaro estos la plej forta apogo de nia afero. La laboristoj ne sole spertos la utilon de Esperanto, sed ili ankaŭ pli ol aliaj sentos la esencon kaj ideon de la esperantismo."

19.2 LA INTERMILITA PERIODO

19.2.1 Sekvoj de la Milito

Post la Unua Mondmilito la esperantistaj laboristoj povis repripensi la eblojn de internacia organiziĝo. Daŭrigi simple tie, kie ĉesis la diskutoj en 1914, tion malpermesis la ŝanĝita situacio. Unue, la esperantistaj laboristoj estis tre forte kaptitaj de la profunda ŝoko, kiun la internacia laborista movado spertis en la komenco de la milito: kiam, malgraŭ ĉiuj proletunuigaj deklaroj, la laboristoj ne solidariĝis trans la landlimojn kun siaj kamaradoj, sed interne de sia

lando kun ĉiuj samnacianoj kontraŭ la tuta „malamika nacio". Due, ili frontis revolucian situacion, kiu naskiĝis el la milito kaj kondukis al socia renverso en Ruslando kaj al ondo da movadoj minacantaj la malnovan reĝimon en preskaŭ tuta Eŭropo; ŝajne proksima monda revolucio de la proletaro konsciigis pri la neceso kiel eble plej efike unuigi la esperantlingvajn socialistojn kaj prepari Esperanton por baldaŭa disponeblo en la nova sociordo. Kaj fine, por ili definitive malkovriĝis la internaj kontraŭdiroj ĉe la „neŭtralaj" esperantistoj, el kiuj pluraj ne hezitis utiligi Esperanton por milita kaj ŝovinisma propagando.

La antaŭkondiĉojn por naciskala agado kreis la rapida restarigo de la laboristaj Esperanto-asocioj en Hungario, Finnlando, Francio, Nederlando (1918), en Germanio (1919) kaj Britio (1920) kaj la fondo de Sovjetlanda Esperantista Unuiĝo (1921), de Aŭstria Laborista Ligo kaj Sveda LEA (1922). Kunligi tiujn rekolektiĝintajn fortojn sur internacia nivelo entreprenis aro da parizaj aktivuloj, kiuj en aŭgusto 1919 revivigis la antaŭmilitan *Le Travailleur Espérantiste* kaj konfidis ties redakton al Eugène Adam. En la gazeto kunlaboris tiaj intelektaj lumoj kiel Romain Rolland, Henri Barbusse kaj Antoine Meillet.

19.2.2 Ideoj de Lanti

Adam, pli konata sub la pseŭdonimo *Lanti*, portas historian meriton kiel kreinto de la internacia laborista Esperanto-Movado. Li naskiĝis en 1879 en norda Francio kaj ricevis nur elementan instruadon, sed rapide akiris al si kiel aŭtodidakto konsiderindan scion. Li lernis la lignaĵistan metion, kiun poste li mem instruis. Partopreno en la milito, ĉe ambulanc-taĉmento, decide influis lian tutan vivon, unue pro la ekstudo de Esperanto en tranĉeo, due pro la enplantiĝinta abomeno al ĉia naciismo, en kiu li rimarkis la fonton de ĉiu malbono. En aprilo 1920 li komencis skizi en artikolserio siajn ideojn pri la organiza problemo kaj la estonteco de Esperanto. Post kiam *Esperantista Laboristo*, forpuŝinte sian franclingvan parton, iĝis en oktobro oficiala organo de la restarigita Liberiga Stelo, Lanti difinis en ĝi la celojn de tiu „Esperantista Internacio de la Laborklaso": justeco en la rilatoj inter la individuoj, kondamno de la kapitalisma sistemo, akcelo de socialismo, forĵeto de nura pacifismo, harmonia kunlaboro inter la socialistoj el ĉiuj partioj kaj sinekzerco por la tasko de mondcivitano. Li energie neis, ke „la nacioj estas la lasta grado de la evoluo ĉe la homaj socioj", kaj, ne kontraŭante la ekzistorajton de naciaj societoj, alvokis al la legantoj jam nun „kvazaŭ" embrie funkciigi societon, kiel povos estonte funkcii

la universala socio". Poste li precizigis, ke per tiu mikrokosmo oni klopodu krei „sennaciecan popolon": „Ni volas ke ĝi senprokraste kutimiĝu al eksternacia agado, pens- kaj sentkapablo." Samtempe aperis unua sugesto pri la nomo de la fondota organizaĵo: *Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT).*

La ideoj de Lanti ne estis nur originalaj pro la ignoremo al naciaj tradicioj, sed ankaŭ pro la dekomenca malemo enŝovi la tiutempajn partiajn pasiojn en la asocion, kies karakteron li difinis ne (parti)-politika, sed „eduka, kleriga, helpa, realiga", por krei ne funkciulojn, sed konsciajn revoluciulojn. Ne malpli radikale Lanti sin esprimis pri la „burĝa spirito" en la ĝenerala Esperanto-Movado, kontraŭ la iluzio, ke Esperanto malhelpos militojn, kaj por la principo, ke „Esperanto ne estas la celo de nia agado, sed nur rimedo por atingi nian celon". Ankaŭ la homaranismo de Zamenhof ne trovis aprobon antaŭ la severa juĝo de Lanti; laŭ li, tiu „povos nur kreski en komunismo". Ĉar li konsciis tamen la logkapablon de la esperantisma etoso, kiu „nebuligas la vidon al konscia klasbatalo", Lanti pledis por laŭeble rigora apartiĝo disde la neŭtrala Esperanto-Movado, konkludante per la batalkrio *„For la neŭtralismon!"*. Sub tiu titolo poste aperis broŝuro kun la artikolaro de Lanti, kiun la franca revoluciulo Henri Barbusse subtenis per jena antaŭparolo: „La burĝaj kaj mondumaj esperantistoj estos pli kaj pli mirigataj kaj teruritaj de ĉio povanta eliri el tiu talismano: Instrumento donanta al ĉiuj ajn homoj la eblon interkompreniĝi."

19.2.3 Fondo de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)

La alvokon de Lanti sekvis okdeko da liberigstelanoj el dekkvin nacioj, kiuj en aŭgusto 1921 dum la 13-a Universala Kongreso en Prago fondis Sennacieca Asocion Tutmondan, per kio la rompo inter la laborista kaj neŭtrala Esperanto-Movado estis plenumita fakto. Valoras citi la rezolucion, kiun akceptis la fondkunveno:

I.

Konsiderante, unuaflanke:

a) Ke nur per faktoj ni sukcesos veki veran intereson pri esperanto ĉe niaj klasbatalaj organizoj;

b) Ke la sperto jam montris, ke U.E.A. estas la sola organizo, kiu en la praktiko montriĝis fruktodona;

c) Sed, ke ĝia politika neŭtraleco malpermesas, ke ĝi povu efike labori sur nia proletara kampo.

II.

Konsiderante, duaflanke:
a) Ke la ĉefa tasko de nia Asocio povas neniel esti politika, ĉar jam ekzistas klasbatalaj organizoj;
b) Ke samkiel antaŭ 20 aŭ 30 jaroj estis nepre necese, ke ĉiuj praktikantoj de esperanto — ĉu pastroj, ĉu anarkistoj, ĉu policanoj — ariĝu por montri per faktoj, ke artefarita lingvo povas esti uzata en la praktiko, estas nun necese, ke ĉiuj esperantistoj, anoj de diversaj klasbatalaj organizoj, ariĝu en unu solan Asocion por montri al la proletaro, per imponaj faktoj, kiom utilega estas esperanto por la batalo kontraŭ la kapitalisma sistemo.

III.

Konsiderante, triaflanke:
a) Ke la kunlaboro kun la t.n. burĝaj esperantistoj povas per tia kompromiso nur malutili al nia propagando;
b) Ke jam multaj faktoj montras klare, ke niaj klasaj kontraŭuloj tute ne deziras, ke esperanto disvastiĝu en niaj proletaj rondoj;
Pro la ĉi-supre diritaj motivoj, la I-a Kongreso de S.A.T.;
Konfesas, ke oni devas profiti je la sperto jam farita ĉe la neŭtrala Asocio *U.E.A.;*
Deklaras, ke nur je teknika vidpunkto nia Asocio povas kontakti kun aliaj esperantistaj asocioj;
.....
For la hipokritan neŭtralismon, for la kapitalismon, vivu S.A.T.!

Konforme al tiuj principoj fondiĝis do tutmonda asocio de individuaj membroj, administrata de komisiono (hodiaŭ Plenum-Komitato) kaj kontrolata de komitato (nun Ĝenerala Konsilantaro), kiu konsistas el po unu membro el ĉiu sektoro (t.e. ĉiu meridiana horzono, senkonsidere al ŝtataj limoj) kaj, ekde 1932, el po unu reprezentanto de ĉiu kunlaboranta LEA. Naciaj aŭ, pli korekte, lingvoteritoriaj Laboristaj Esperanto-Asocioj (LEA) daŭris ekzisti, sed kun la ĉefa celo propagandi la lingvon en sia regiono, estante „rezervujoj" de SAT, dum SAT mem komprenis kiel sian taskon apliki Esperanton laŭ tutmonda skalo.

Ĉiujare SAT organizas kongreson, en kiu ĉiu aktiva membro havas voĉdonrajton; pri proponoj findecidas referendume la tuta aktiva membraro, kies adresoj aperas en la Jarlibro. Sekcioj, sub kontrolo de la Plenum-Komitato, ebligas specialan agadon en fakaj kaj profesiaj rondoj, kontraŭe al la frakcioj (nuntempe i.a. liberecana, liberpensula, naturista, pacista, sennaciista, naturamika; pli frue ankaŭ komunista, bolŝevist-leninista kaj socialista), kiuj kuniĝas ekster la respondeco de SAT por influi siajn respektivajn partiojn aŭ organizajojn.

Internacia Socia Revuo: La ĉefa ligilo de laboristaj esperantistoj antaŭ la fondo de SAT.





Eŭgeno Lanti, la fondinto de SAT: Li konfuzis amikojn kaj ŝokis kontraŭulojn.



La verketo de Lanti *For la neŭtralismon!* estis la teoria bazo de la skismo inter la laboristoj kaj "neŭtraluloj".

19.2.4 Disfloro de SAT

Ke SAT konsideris sian provokon al la neŭtralismo unuaranga, montris en 1922 la Kongreso en Frankfurto: Per malgranda plimulto oni decidis, ke SAT-ano ne rajtas esti samtempe membro de neŭtrala Esperanto-unuiĝo, krom se „la kunlaborado povos doni profiton al nia afero". Kvankam Romain Rolland, Honora Prezidanto de la 2-a Kongreso, akre kritikis tiun decidon, riproĉante „ke la revoluciaj esperantistoj tute ne konscias pri la grandeco de Esperanto . . . . (kiu) estas, per si mem, revolucio multe pli efika ol ĉiuj t.n. revoluciaj kongresoj, ĉar ĝi kreas . . . . pensmanieron internacian, sennaciecan, tutmondan", nur en 1924 la severa dua paragrafo de la statuto estis mildigita. Tamen, en tiuj du-tri jaroj jam estis fortiritaj el la neŭtrala Movado multaj seriozaj elementoj, kaj poste daŭris tiu evoluo, ke homoj maldekstremaj preferis membriĝi en SAT anstataŭ en aliaj Esperanto-asocioj. La natura sekvo estis ne nur laŭnombra malfortiĝo, sed ankaŭ plia ideologia malriĉiĝo en la tiama neŭtrala Movado, kies gvidantoj iom post iom perfekte adaptiĝis al la klišaj imagoj de SAT — komercistoj, generaloj, reakciaj profesoroj kaj pastroj, agantaj kun amaso da etburĝaj esperantistoj. Tiun fizionomion SAT vipis per sukaj esprimoj kaj proleta sarkasmo, precipe el la plumo de Barthelmess kaj Nekrasov, sed pro sia apartiĝema rigoro ĝi sukcesis pli ĝuste cementi la internan staton de la neŭtrala Esperanto-Movado ol ŝanĝi ĝin.

La membraro de SAT rapide kreskis: De 1.064 en 1922 al 2.960 en 1926, 5.216 en 1927 kaj 6.500 anoj en 1929. En oktobro 1921 *Sennacieca Revuo,* la antaŭa *Esperantista Laboristo,* fariĝis la organo de SAT, monate aperanta; unu jaron poste ĝi cedis tiun oficialan rolon, mem plu aperante, al nova gazeto semajna, *Sennaciulo,* sub la redakto de juna germana komunisto Norbert Barthelmess, iom post iom unu el la plej bone redaktataj gazetoj en Esperanto. Barthelmess, kiu baldaŭ konvertiĝis al la linio de Lanti, kaj Lucien Bannier, malnova amiko de Lanti, dum pli ol kvar jardekoj direktos la ĉefajn laborojn de la Asocio. Provizore, establiĝis tri centroj de administra kaj redakta gvido: Parizo, Leipzig kaj Moskvo. La signifo de *Sennaciulo* kaj aliaj SAT-gazetoj multoble superis tiun de esperantlingva gazeto kun komparebla eldonkvanto, ĉar, unuavice en la 1920'aj jaroj, 100-200 artikoloj ĉiujare estis tradukitaj en naciajn lingvojn.

Ekde la komenco konfliktoj ne preteriris la novan organizaĵon, kaj fakte ĝis 1932 ĝi ĉiam pene devis lukti por sia ekvilibro. Jam dum la 3-a Kongreso en Kassel en 1923, kiun honorprezidis Albert Einstein, socialdemokratoj — sensukcese — provis transformi la sennaciecan strukturon en internacian, kun naciaj sekcioj, kaj sam-

okaze fiaskis, i.a. pro malunueco en la propra tendaro, la propono de komunistoj subigi SAT al la Tria Internacio. En 1924 la anarkistoj forlasis SAT kaj fondis sian Tutmondan Ligon de Esperantistaj Senŝtatanoj. Sed lasante al la ceteraj frakcioj, ĉefe komunista, socialdemokrata kaj sennaciista, certan terenon por aŭtonoma agado, la Asocio povis dum kelkaj jaroj konservi sian supertendencan karakteron malgraŭ la estiĝanta konkuremo inter diversaj socialismaj skoloj. En tiu tempo de interna stabileco — kiam novaj esperantistoj unuavice rekrutiĝis el la laboristaro, kiam Esperanto impete demonstris sian vivoforton kaj riĉiĝis je tiu freŝa, batalema stilo, kiu distingas revoluciulojn, kiam la flua parolkapablo de laboristoj hontigis amason da diletantoj kun pli alta eduko — SAT faris netakseblajn servojn al la prospero de la tuta Esperanto-Movado. Ne evoluis aparta SAT-dialekto, sed SAT-stilo, nome „simpla stilo", kiel tekstis dezirespriмo de la kongresanoj en Bruselo (1924). Periodo, dum kiu oni enkondukis kelkajn ekstravagancaĵojn kaj gaje eksperimentis pri novaj vortoj kaj sufiksoj, estis baldaŭ likvidita per decido, en 1925, kontraŭ tro facilanima enkonduko de neologismoj.

Moskvanoj fondis en junio 1922 altnivelan literatur-sciencan revuon *La Nova Epoko*, kies taskon daŭrigis en oktobro 1923 *Sennacieca Revuo*. En 1925 aperis la unua eldono de tre sukcesa lernolibro *Petro* verkita laŭ duonrekta metodo. Sekvis pluraj beletraĵoj, originalaj (Barthelmess, Miñalski, Ĥrima, Bergiers, Izgur) kaj tradukitaj (Hašek, London, Sinclair, Voltaire), sciencaj broŝuroj pri fiziko, kemio, sekspsikologio, lingvistiko, geografio kaj politikaj eldonaĵoj de Barbusse, Marx kaj Engels, Lenin *(Ŝtato kaj Revolucio)*, Tolstoj, Kropotkin, Lanti, kaj esperantologiaj studoj de Drezen *(Zamenhof)*, Neergaard *(Fremdvortoj en Esperanto)* kaj de Bruin (movadhistorioj). Lanti mem en 1928 iniciatis la atuton de SAT, la *Plenan Vortaron*, kiu aperinte en 1930 furore disvendiĝis, tiel ke jam post du jaroj necesis dua eldono.

Malpli sukcesaj estis la provoj influi aliajn internaciajn laboristajn asociojn favore al Esperanto; ili malofte rezultigis multe pli ol simpatideklarojn. La britaj sindikatoj en 1926 sin esprimis por la enkonduko de Esperanto en internaciajn rilatojn, sekvante la ekzemplojn de usona, franca, hispana kaj portugala laborkonfederacioj. Ankaŭ internacia anarkista kongreso voĉdonis en 1924 por internacia lingvo. Esperanton efektive ekuzis dum certa tempo nur Internacia Transportlaborista Federacio (ekde 1924), dank' al sia sekretario N. Nathans, Ruĝa Sportintern kaj la malgranda Internacio de Socialista Kunbatalo.

Pli grandan efikon ol multaj aliaj subtenaj proklamoj havis la rezolucio pri Esperanto akceptita dum Kongreso de Socialista Laborista Partio de Jugoslavio en Vukovar en 1920:

La Dua Kongreso de Socialista Laborista Partio (de Komunistoj) de Jugoslavio, konstatante la neprecon de helpa internacia lingvo ĝenerale, kaj konkludante ke tiun bezonon komplete kontentigas la helpa internacia lingvo „Esperanto", kiel tion emfazis ankaŭ Soveta Ruslando enkondukante la lingvon kiel devigan studobjekton en ĉiujn lernejojn kaj adoptante ĝin por la internacia komunikado en la kadro de la III-a Internacio [2], decidas ke:

1. Ĝi konsideras ĉiujn esperantistajn komunistajn grupojn kvazaŭ siaj sekcioj en Jugoslavio;
2. cele de efika propagando ĝi rekomendas al ĉiuj partiaj kaj sindikataj organizoj donadi moralan helpon al esperantistaj sekcioj, ebligante la aranĝadon de prelegoj kaj kursoj pri Esperanto en laboristaj domoj;
3. rekomendas al la centraj kaj ĉiuj regionaj partiaj kaj sindikataj gazetoj malfermi tiucele al ili siajn kolumnojn.

Sekve de tiu rezolucio, kaj de la efektiva sinteno de la partio, la laborista kaj esperantista movadoj en Jugoslavio inter la du mondmilitoj havis similan, interplektiĝantan historion. Ke multaj plej elstaraj revoluciuloj, kiuj dum la lasta milito gvidis kaj parte ankoraŭ gvidas Jugoslavion, inkl. Prezidenton Tito mem, lernis la Internacian Lingvon kaj ofte esprimis sin favore al ĝi, estas sendube fenomeno aparte jugoslavia, kiu tiagrade ne estis spertita en alilandaj laboristaj Esperanto-Movadoj.

19.2.5 SEU kontraŭ SAT

Motivinte sian ekziston surbaze de la tezo, ke ne eblas apartigi lingvon de la socia ĉirkaŭo, SAT baldaŭ siaflanke spertis, kiom dependas laborista organizaĵo, eĉ se unuavice kultura kaj interhelpa, de la interna stato en la internacia laboristaro.

Nuboj de skismo unuafoje serioze ekminacis ĝin dum la 8-a Kongreso en Göteborg (1928), kiam Ernest Drezen, altranga funkciulo en sia ŝtato kaj prezidanto de Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU), lanĉis atakon kontraŭ artikoloj de Lanti, kritikaj al la postlenina evoluo en Soveta Unio. Drezen, dum jaroj la ĉefa antagonisto de Lanti, urĝe rekomendis — por daŭrigi la kunlaboron — „trovi mezan vojon por ni ĉiuj, kun zigzagoj jen al unu flanko, jen al alia", kaj efektive la Kongreso akceptis aldonon al la statuto, kiu celis ŝirmi la Asocion kontraŭ altrudo de unu difinita partipolitika linio. Drezen tiutempe ankoraŭ opiniis, ke „ne estas nunmomente utile dispecigi la laboristajn esperantistojn en izolitaj eble malamikaj

[2] Pri tiuj punktoj tamen komparu p. 649. Necesas aldoni, ke en Jugoslavio la plimulto en la laborista Esperanto-Movado estis socialdemokrata.

politiktendencaj frakcioj". La prokraston de aperta konflikto ankaŭ favoris la neakcepto de programo; komisiono por ellabori programon estis starigita jam en la Viena Kongreso (1925), sed en 1929, submetinte plurajn projektojn, ĝi ĉesis funkcii.

Tamen, la programa demando decidigis la pluan sorton de SAT kiel supertendenca organizaĵo. Fine de 1928 Lanti aperigis broŝuron *La Laborista Esperantismo*, kiu, prezentiĝante „kvazaŭa programo" de SAT, formulis sennaciismon kiel apartan doktrinon. Pri la termino mem antaŭe ne okazis detalaj diskutoj, ĉar la plej multaj, inkl. komunistojn kaj ŝajne eĉ Lanti, interpretis ĝin internaciismo plus internacia lingvo. Sed lige kun la evoluo en Soveta Unio, kiu anstataŭ revi pri baldaŭa mondrevolucio komencis sin dediĉi en 1928 al la konstruado de socialismo en unu sola lando, kreante specon de soveta patriotismo, modela por ĉiuj alilandaj komunistoj, la tezoj de Lanti, direktitaj kontraŭ submetiĝo al la soveta ekzemplo, estis konsideritaj kiel danĝera herezaĵo, des pli ĉar Lanti sin turnis kontraŭ ĉia naciliberiga batalo, kiu ne alportas al laboristoj ekonomian liberecon, kaj rifuzis kontraŭbatali imperiismon, ĉar tio „signifas bari la vojon al la historia procezo" akcelanta sennaciiĝon ankaŭ sub la kondiĉoj de kapitalisma ekspluatado en la kolonioj. Koncedante ke SAT ne povas adopti sennaciismon kiel socipolitikan teorion, li tamen malkaŝis, ke la Asocio celas ĝin diskonigi kaj pravigi. Krome, li kulpigis la laboristajn gvidantojn pro perfido, ĉar ili malatentas la lingvan problemon. Li asertis, ke la unuiĝo de la proletaro, premiso por sukcesa agado, „estas ebla nur per la helpo de komuna lingvo".

La diskuto pri la broŝuro ekflamis dum la 9-a Kongreso en Leipzig, en 1929, kun la rezulto, ke en la fina rezolucio unuanime estis nomita mispaŝo la maniero, laŭ kiu estis prezentita *La Laborista Esperantismo* de Lanti, ĉar ĝi povus kredigi, ke ĝi estas programo oficiala de SAT; kompense al tiu riproĉo la Kongreso esprimis sian fidon al ĉiuj gvidantaj organoj.

19.2.6 Skismo en la Laborista Esperanto-Movado

Sed jam per supra cedo estis liverita taŭga armilo por ataki la tutan linion de SAT, kaj eĉ se Lanti estus pistinta la restantan kvanton de sia broŝuro, la dissplitiĝo de SAT ne estis plu evitebla. Nomante la gvidantaron de SAT oportunisma, nemarksisma, kontraŭsoveta kaj etburĝa, la sovetaj SAT-anoj kaj iliaj samideanoj alilandaj troviĝis sub la premo de la decidoj de Komintern, kiu celis meti sub sian kuratorecon ĉiujn, ankaŭ kulturajn, laboristajn organizaĵojn kaj — anstataŭ batali unuece kun ĉiuj socialistoj kontraŭ la faŝisma danĝero — anatemis la alitendencanojn surbaze de la absurda teorio pri socialfaŝismo, etikedo baldaŭ asignota ankaŭ al

SAT. Lanti, el kies verkema plumo tiutempe aperis la libro *Naciismo,* faris la lastan provon por repacigi la disputantojn, preskaŭ petege apelaciante, „ke ni ĉiuj, pli-malpli konscie, estas unue esperantistoj kaj nur due partianoj". Ne povas esti dubo pri „fidela esperantisteco" de Drezen kaj lia anaro, sed la politika situacio apenaŭ lasis al li alian eblecon. Kiam en Soveta Unio regionaj dialektoj estis konscie flegataj kaj altigataj al rango de naciaj kaj kulturaj lingvoj, la malserioza diro de Lanti, ke la naciaj lingvoj formortu kaj cedu sian lokon al Esperanto, necese devis ŝoki, ĝeni kaj kaŭzi reagon de personoj laborantaj por Esperanto en la nova, malfacila situacio.

En 1930, fine, SEU kaj la cetera SAT-opozicio kontraŭbatalis la Asocion per ĉiuj disponeblaj rimedoj: reteno de alta monsumo el SAT-kotizoj en Moskvo, denunco de *Sennaciulo* ĉe la aŭtoritatoj kiel „kontraŭsoveta eldonaĵo" (la efiko daŭras ĝis nun), bojkoto al la 10-a SAT-Kongreso en Londono, eksiĝo el la t.n. Gotenburga Konvencio (kiu dividas la laborojn inter SAT kaj LEA-oj) kaj sekva fondo — kune kun Germana LEA, kiu en aprilo 1930 forlasis sian supertendencan pozicion — de Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo (EKRELO). SAT rebatis, eksigante Drezen kaj ok elstarajn oponantojn, dum la proponoj de la opozicio al la SAT-Kongreso esprimi malfidon al la Plenum-Komitato plene fiaskis. La atmosferon ne plu povis mildigi ĉarma gesto de novjorkaj SAT-anoj, kiuj organizis monkolekton por donaci „esperantistan traktoron" al la soveta agrikulturo.

Gardi la supertendencecon de la Asocio spite la ardajn rivalaĵojn inter la proletaj partioj — tiu ĉefa zorgo de Lanti rivelis sian malsukceson. La skismo eĉ pliprofundiĝis pro la foriro de aro da socialdemokratoj, unuavice la Aŭstroj sub Franz Jonas, kiuj en junio 1933 fondis sian *Internacion de Socialistaj Esperantistoj* (ISE), post kiam SAT refoje rifuzis transformiĝi en internacian organizaĵon. ISE, kiu kolektis anojn, krom en Aŭstrio, ĉefe en Hungario kaj Ĉeĥoslovakio, apenaŭ povis eklabori, ĉar en 1934 la aŭstrofaŝismo malebligis socialistan aktivecon, kaj ne transvivis la militon.

Sed ankaŭ en tiu ĉi amara horo SAT, senigita de siaj sovetaj membroj, rezistis al la tento perfidi siajn idealojn. La partoprenantoj de la „batalkongreso" en Amsterdam (1931), kiun la opozicio protestе forlasis, deklaris fronte al la realiĝinta skismo „resti preta kiel antaŭe batali por malebligi, ke kapitalistaj landoj ataku Sovetion kaj malebligu, ke la nuna grandioza kaj ĉiel subteninda provo pri konstruado de socialismo sur unu sesono de l'mondo estu sukcesa".

Per la skismo SAT iĝis viktimo de siaj propraj principoj. Montriĝis, ke ne eblas izoliĝi de la mondpolitika scenejo kun ĝiaj ĉiamaj

interbataloj; kreita rezulte de la objektiva laŭklasa dissplitiĝo en la socio, la Asocio mem nun spertis la politikan realaĵon interne de la laborista Esperanto-Movado. La iluzio stari super la bataloj kaj ekster la fluoj en la internacia laborista movado mizere krevis, kaj la anakronisma provo de Lanti savi la situacion per retiriĝo al Esperanto kiel „neŭtrala fundamento" ne haltigis la disfalon. Kaj tamen tiu tragika evoluo, akompanata de plej akraj kalumnioj kaj insultoj inter antaŭaj kamaradoj, entenas pozitivan trajton. Unu plian fojon, post la Ido-krizo kaj burĝa-laborista skismo, Esperanto demonstris sian vivon, kiun internaj disputoj ne povis endanĝerigi, sed, kontraŭe, ĉiam denove pulsigi per nova freŝo.

19.2.7 De la Epizodo de ESKI ĝis la Tragedio de IPE

La komunistaj esperantistoj, almenaŭ tiuj, kiuj kutimis sekvi la aktualan linion de Komintern, nun sub la absoluta rego de Moskvo, sen iaj deflankiĝoj, nun estis inter si. Kvankam en la unuaj jaroj de SAT ili grave kontribuis al la riĉigo organiza kaj intelekta de la Asocio, la perspektivoj por memstara agado ne estis tro kuraĝigaj. Post la revolucio rusaj esperantistoj ofte tro aplombe agis, distrumpetante decidon pri deviga enkonduko de Esperanto en la lernejojn, dum efektive la Popola Komisarejo por Klerigo nur establis komisionon por studi tiun eblecon. Kiam Rolland jam estis aklaminta la „historian eventon" kaj eĉ burĝaj esperantistoj rekonis „la grandegan civilizacian meriton" de tia decido, la soveta gazetaro klarigis fine de 1921, „ke opinii la lingvon Esperanto, kiel internacian lingvon, indan je ekskluziva registara atento, estas nun antaŭtempe" kaj ke Esperanto-rondetoj estas privataj organizaĵoj, ne sekcioj de politklerigaj fakoj. Simila aventuro okazis ĉirkaŭ t.n. Esperanta Sekcio de Komunista Internacio (ESKI), kiu, ne ricevinte akcepton kiel sekcio de Komintern, malaperis en 1921/22. En julio 1921, tamen, la 3-a Kongreso de Komintern decidis starigi „Studan Komisionon por Alpreno de la Lingvo Internacia Helpa en la III-a Internacio", kies prezidanto kaj sekretario estis idistoj. Ĉar Komintern, laŭ la vortoj de Rákosi, „havis nenian intereson por tiu entrepreno", konsiderante ĝin tute flanka kaj privata, ĝi estis likvidita en marto 1922. Kiam tio ne malhelpis idistojn fanfaroni pri decido favora al Ido, Komintern precizigis en majo 1923, ke „neniu porlingva organizaĵo havas la rajton apogi sin sur la aŭtoritaton de *Komintern*". Aldone al tio, Zinovjev nomis la esperantistojn stranguloj, admonante ilin: „Vi ne neniigos la diferencon de lingvoj."

Aliflanke, sub la direkto de Drezen, baldaŭ serioziĝis la poresperanta agado en Soveta Unio. La nombro de kursanoj daŭre kreskis, en 1923 la ŝtatestro Kalinin verkis antaŭparolon por eldonaĵo

de SAT *(Dokumentoj de Komunismo)*, oni eldonis poŝtmarkojn kun Esperanta teksto, kaj en 1926 okazis sub honora prezido de la Popola Komisaro por Klerigo, Lunaĉarskij, la 6-a SAT-Kongreso en la Taŭra Palaco de Leningrado. Ju pli forgesiĝis la pli fruaj troigoj, des pli Esperanto floris kaj ekĝuis oficialan apogon.

El la antaŭa SAT-opozicio, kiu ekde oktobro 1930 eldonis la duonmonatan revuon *Internaciisto*, estiĝis dum kongreso fine de aŭgusto 1932 en Berlino *Internacio de Proleta Esperantistaro* (IPE), kiu — sub la ideologia gvidilo de marksisma mondkoncepto kaj dialektika materialismo — difinis kiel siajn taskojn „organizi la disvastigon kaj aplikon de Esperanto por la revolucia batalo". Tuj aliĝis al la nova organizaĵo, krom SEU, laboristaj Esperanto-asocioj en Germanio, Bulgario, Japanio kaj Usono, sekvis sekcioj en Ĉinio, Britio, Belgio, Francio, Ĉeĥoslovakio, Nederlando k.a., kaj baldaŭ IPE pretendis reprezenti 13.000 proletojn en dek ok landoj.

Per „Proleta Esperanto-Korespondado" (PEK) estis organizita kolektiva perletera kontakto inter sovetaj kaj eksterlandaj fabrikoj kaj agrikulturaj entreprenoj. EKRELO eldonis dum kelkaj jaroj pli ol sesdek publikaĵojn, i.a. politikajn broŝurojn (de Stalin, Molotov, Radek, Ŝvernik k.a.) kaj valorajn verkojn pri esperantologio (de Drezen, Rublov, Ĵirkov, Varankin), kaj preparis esperantlingvan tradukon de la verkoj de Lenin, kies aperigon malhelpis la venko de Hitler.

Fine de 1931 estis fondita, sekve de iniciato de Ludwig Renn kaj E. Miĥalski, Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj (IAREV), kiel sekcio de Internacia Unio de Revoluciaj Verkistoj (Moskvo), kiu eldonis la revuojn *La Nova Etapo* (1932-33), *Proleta Literaturo* (1934) kaj *Internacia Literaturo* (1935-36) kaj akiris la simpation de Rolland kaj Barbusse.

Malgraŭ tiuj multpromesaj iniciatoj, IPE fakte neniam sukcesis plenforte eklabori; ĝia tuta ekzisto pasis sub malfavora stelo. Jam duonan jaron post sia fondiĝo, ĝi perdis, pro la venko de faŝismo en Germanio, sian germanan sekcion kaj la oficejon en Berlino. La organon *Internaciisto* anstataŭis *Sur Posteno*, eldonata sinsekve en Moskvo, Amsterdam kaj Nîmes (Francio). Jam ekde 1935 ĉiam malpli rimarkiĝis kunlaboro de SEU en IPE; en la tiujara kongreso en Antverpeno, same kiel en la tria (kaj lasta) IPE-kongreso en Parizo (1937), partoprenis neniu delegito el Soveta Unio. Fine, rilatoj inter IPE kaj SEU tute rompiĝis, kiam sovetaj esperantistoj estis metitaj en la kategorion de danĝeraj kosmopolitoj kaj SEU denuncita kiel „internacia spiona organizaĵo" kontraŭsoveta. Miloj da membroj de SEU estis ĵetitaj en karceron kaj mortotendaron, se ili ne estis



Inter la du mondmilitoj, dekmiloj da laboristoj lernis Esperanton: Germanaj aktivuloj en Ĉeĥoslovakio (ĉ. 1925).



Ludwig Renn (1889-) prezidis la Internacian Asocion de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj.

La 6-voluma *Proleta Kurso de Esperanto*, eldonita en Tokio en 1930/31 (represita en 1968), notis grandajn sukcesojn.



mortpafitaj tuj, kiel Drezen kaj aliaj gvidantoj.[3]

IPE per tio perdis, post la Germanoj, ankaŭ siajn sovetajn inspirintojn kaj plej fervorajn batalintojn — por ne paroli pri la aliaj batoj, kiuj silentigis ĝiajn kamaradojn en Hispanio, Ĉinio aŭ Japanio.

Restante en kompleta nescio pri la tragikaj okazaĵoj en Soveta Unio, la konfuzitaj gvidantoj de IPE en okcidenta Eŭropo nur pene spitis la paraliziĝon de sia organizaĵo. Faliginte proponon de kelkaj britaj „likviduloj" dissolvi la Internacion kaj rekomendi aliĝon al IEL, ili en 1939 ankoraŭ sukcesis reaperigi tri numerojn de *Internaciisto*, sed la eksplodo de la milito definitive alportis la finon de IPE. Marcel Boubou kaj Honoré Bourguignon, la francaj motoroj de IPE kaj IAREV, pereis en germanaj koncentrejoj.

19.2.8 Persekutoj

SAT ne havis motivon por triumfi kaj vidi sin pravigita, sed ĝiaj gvidantoj eĉ esprimis sian respekton al la „sincera konvinko" de la oponintoj, gvidataj de „impulso fortega kaj kredantaj servi al sia idealo". Ĝia propra historio de tiam pasis pli trankvile kaj malpli spektakle. En la faŝismo, kies ekrego en Germanio necesigis en 1933 la transigon de la administracio el Leipzig al Parizo, SAT frue vidis minacon ne nur al Esperanto, sed al la tuta homa civilizo, ankaŭ tiurilate vaste superante laŭ sia klarvido la gvidantojn de la neŭtrala Movado. Post la persekutoj kontraŭ la laborista esperantistaro en Italio, Hungario, Aŭstrio kaj Germanio, ĝi sciis utiligi la servojn de Esperanto por aperigi en siaj organoj aŭtentikajn raportojn de kamaradoj, kiuj priskribis la situacion en la landoj sub diktatoreco, kaj por organizi helpagadon al hispanaj respublikanoj suferantaj pro la civila milito. (Laborista Esperanto-Klubo en Valencia eldonis de 1936 ĝis 1939 la revuon *Popola Fronto*).

Entute, la historio de la internacia laborista Esperanto-Movado grandparte estas ankaŭ historio de persekutoj. Dum diversaj periodoj la organiziĝo de laboristaj esperantistoj estis ne ebla kaj aparteno al SAT aŭ ricevo de ĝiaj revuoj malpermesita — i.a. en Pollando, Litovio, Hungario, Bulgario, Rumanio, Italio kaj Portugalio. Okaze de la 2-a Kongreso en Frankfurto (1922) la loka polico esplordemandis la organizantojn, sekve de denunco de esperantlingva policisto, kiu indikis la SAT-anojn kiel „danĝerajn komunistojn". En Hungario iu polica ĉefo ordonis jam antaŭ la Unua Mondmilito, ke „laboristoj ne lernu lingvon, kiun la labordonantoj ne komprenas". Aparte signifoplena, kvankam ne longe valida, estis la cirkulero de la franca ministro de publika instruado, Léon Bérard, kiun

[3] Por detaloj vidu Ĉapitron 21.

li dissendis en junio 1922 al ĉiuj universitataj rektoroj de sia lando kaj en kiu li — kun evidenta refero al sennaciismo, aŭ almenaŭ internaciismo — atentigis „pri la danĝeroj, kiujn la instruado de Esperanto ŝajnas enhavi dum la nunaj cirkonstancoj":

> Estus domaĝe, ke la edukado, bazita sur la latina kulturo, kiun ni defendas, povus esti malpligrandigata per la plivastiĝo de arta lingvo, alloga pro sia facileco.... La franca lingvo ĉiam estos la lingvo de la civilizacio.... Plie la priesperantaj danĝeroj ŝajnas esti pligrandigitaj lastatempe. Internaciaj organizaĵoj.... penadas por pliampleksigi la rilatojn inter la Esperanto-grupoj ĉiulandaj.
> Laŭ dokumentoj, kiujn publikigas iuj el tiuj organizaĵoj, la celo de tiu propagando ne estas ĉefe plisimpligi la lingvajn rilatojn inter la popoloj, sed kontraŭe forigi, en la formado de la penso, ĉe la infano kaj la maturulo, la ekzistopravon de nacia kulturo....

Dank' al interveno de la „neŭtralaj" esperantistoj, kiuj rapidis certigi, ke Esperanto povas esti uzata por kiu ajn celo kaj ke ĝi ne respondecas, eĉ „se ŝtelistoj kaj banditoj uzas ĝin", la malpermeso de instruado en ŝtataj institucioj, praktika sekvo de tiu cirkulero, estis nuligita en septembro 1924 de la posteulo de Bérard. Sed tie ĉi kaj en multaj aliaj okazoj montriĝis, ke la neŭtralaj esperantistoj konsideris sin la veraj reprezentantoj de la esperantismo kaj ke iliaj organizaĵoj senhezite forĵetis la neŭtralecon, kiam reakcia registaro transprenis la regadon. Plej elokventaj ekzemploj estis Italio, Hungario, Germanio, Aŭstrio kaj Japanio. Notinde, Lanti kuraĝigis kamaradojn, se ilia organizaĵo estis malpermesita, rifuĝi al la neŭtrala Movado, sed lia nova devizo „Vivu la neŭtralismo!" ne havis ĉie la celatan efikon, ĉar precipe Germanoj kaj Hungaroj rifuzis kunlabori en sialanda Esperanto-asocio, kiu tro forte sin ligis al la faŝisma aŭ ekstrem-dekstra reĝimo. La ĉapitron pri persekutoj oni povas detaligi per skuaj ekzemploj de homaj suferoj, kiuj ja ne ĉiam ŝuldiĝis ĉefe al esperantisteco; sed tre ofte la aŭtoritatoj pliseverigis la traktadon de diverstendencaj socialistoj, kiam aldoniĝis la scio de Esperanto. Tamen, paradokse, laboristaj esperantistoj spertis plej grandskalan persekutadon ĝuste en Soveta Unio sub Stalin, deklarita kiel la unua ŝtato de laboristoj kaj kamparanoj.

19.2.9 Retiriĝo de Lanti

Dume evidentiĝis, ke SAT delonge ne plu dependas de la persono de Lanti, tute male, li mem pli kaj pli komprenis, ke lia restado en gvida funkcio prezentas troan ŝarĝon por la unueco de la Asocio. Spertinte, „ke ekzistas la emo ĉe multaj personoj konsideri miajn dirojn kiel ion oficialan", spite ĉiujn certigojn, ke sennaciismon li

konsideras nur unu el la pluraj kunekzistantaj tendencoj en SAT, Lanti eksiĝis el la prezidanteco de SAT dum la 13-a Kongreso en Stockholm (1933). En sia abdika deklaro li konfirmis sian konvinkon, ke SAT ne devas havi socipolitikan teorion, eĉ ne sin bazi sur marksismo (en 1928 li estis eksiĝinta el Franca Komunista Partio), kaj ke lia pli frua devizo „Ni estu unue revoluciuloj, due esperantistoj" estis taktika, kvankam ne principa, eraro, nun korektenda per inversigo de la prioritato. (Tia rekonsidero tamen ne estis surpriza: Jam en 1923 Laurat riproĉis al li: „. . . . je la fondiĝo de S.A.T., internacia lingvo estis por vi *rimedo* por faciligi la klasbatalon. Hodiaŭ ĝi fariĝis por vi absoluta, memstara celo . . . . "). Lian foriron en Stockholm — baldaŭ poste li komencis mondvojaĝon, de kiu li ne plu revenis Eŭropon — do certe kaŭzis ankaŭ ia turmenta sento, ke eble lin trafas kvanto da kulpo pro la skismo kaj ke la ŝancojn de eventuala reunuiĝo li povus bari per sia persono (fakte, en 1935, sekve de la popolfronta taktiko de Komintern, okazis intertraktadoj inter SAT kaj IPE — senrezulte, tamen).

La opiniesprimoj de Lanti dum la postaj jaroj, precipe liaj leteroj, montras pensoriĉan homon, kiu restis fidela al la principo dubi pri ĉiu kaj ĉio, herezulon kaj cinikulon, kiu kun sia malfacila karaktero, „per sia senindulga ironio, sia kruda sincero, sia absoluta preterlaso de ĉia ĝentileca hipokrito" (Waringhien) ne malofte konfuzis amikojn kaj ŝokis kontraŭulojn. Alternis en bunta sinsekvo eldiroj neortodoksaj, ĉu pri la neceso esti „ĝisostaj esperantistoj", t.e. pri Esperanto kiel revoluciiga faktoro en si mem, aŭ pri la „grandrusa naciismo", kies disvastigon li konsideris „defendebla kaj iel prava", nome preferinda al la vekiĝo „de patriotaj sentoj en Ukrainio, en Blankrusio kaj alie", ĉar tio lasta malhelpus sennaciiĝon en Soveta Unio, aŭ pri la interbuĉado de naciistoj, kiun li trovis „tute normala kaj eĉ laŭdinda". Kaj la ĉi-sekva konfeso farita en 1936 certagrade senkulpigis la opoziciulojn: „La sennaciismo ne estas pravigebla je pure marksista vidpunkto, ĉar ni neas, ke la ekonomiaj faktoroj ludas la plej gravan rolon en la historia procezo." La vera monstro, kiun Lanti rekomendis kontraŭbatali, estis la naciismo, kaj ne nur ĝi, sed ĉiu nacio („Aparato farita el potencavido, ĵaluzo, malamo kaj stulto") kaj ĉio iel ligita al naciaj tradicioj, inkluzive lingvojn: „. . . . pereu ĉiuj naciaj kulturoj". Manko de diferenciga kapablo kondukis lin al egala kondamno de patriotismo kaj ŝovinismo, faŝismo kaj stalinismo, dum internaciismon li interpretis „kiel juran kompromison inter la naciismo kaj la postuloj de la ekonomio", kaj lia influo pluefikas en SAT ĝis hodiaŭ, kiam tiu, ekz., nur kun moko rilatas al naciliberigaj celadoj aŭ al seriozaj klopodoj de UEA atentigi la mondon pri lingva kaj kultura imperiismo.

En januaro 1947, Lanti, tute soleciĝinta, faris memmortigon en Meksiko pro nekuracebla malsano, transdonante — en sammonate aperinta artikolo „Mi fariĝis imperiismema" — la lastan materialon al estontaj ekzegezistoj de sia pensaro, kiujn li lasis cerbumi pri la signifo de sentenco tipe lantia pro sia provokemo kaj fragmenteco: „....nur la imperialismo povas unuige efiki". — „La enigmo restas kompleta", rezignacie komentis eĉ Barthelmess.

En la lastaj jaroj antaŭ la Dua Mondmilito SAT iom restabiliĝis. En 1936 ĝi rezoluciis kontraŭ la disvastiĝanta ŝovinismo, en 1937 ĝi okazigis en Rotterdam Kongreson kun rekorda nombro de partoprenantoj: 800 el dek ses landoj. *Sennaciulo* denove atingis 5.000 abonantojn, kaj en 1938 ekaperis, kunlabore kun la Nederlandanoj, serio da romanoj. Jam sub la nuboj de la baldaŭa kataklismo, komence de aŭgusto 1939, la Kongreso en Kopenhago starigis LEA-Komitaton por koordini la laboron, antaŭ ĉio propagandan, de la landaj Laboristaj Esperanto-Asocioj.

19.3 POSTMILITA EVOLUO DE SAT

19.3.1 Reaktiviĝo kaj Ekstagnado

Post la milito, dum kiu SAT klopodis teni kontakton kun atingeblaj membroj, la Asocio rapide rekomencis sian laboron. En 1946 renaskiĝis *Sennaciulo*, nun monata, kaj pruviĝis la sennacieca solidareco per helpservo por la malsatantaj kamaradoj. Pli frue ol aliaj Esperanto-organizaĵoj SAT etendis sian manon al tiuj membroj, kiuj mem suferinte sub faŝismo nun spertis la efikojn de kolektiva kulpigo. En „vera SAT-spirito", t.e. en familia etoso, okazis la unua postmilita kongreso, en Aarhus (Danlando) 1947, kiu plifortigis la kunlaboron inter la diversaj LEA-oj. En la sekva jaro aperis la du volumoj de *Leteroj de Zamenhof*, kaj SAT reatingis membronombron de 5.000. Laŭnombre imponis ankaŭ la 21-a Kongreso en Amsterdamo, kiu altiris pli ol 1.200 partoprenantojn. Aperis en 1949 la dua eldono de *Faŭsto* I, en traduko de Barthelmess, kaj biografio pri Rosa Luxemburg. Sed la espero ĉerpi novan forton el la socialismaj landoj baldaŭ cedis al unu plia seniluziiĝo, kiam la kampanjo kontraŭ „kosmopolitismo" malhelpis ankaŭ tie la disvolviĝon de Esperanta agado. Okaze de tio, solidariĝis — per unika faro — la Plenum-Komitato de SAT kaj la Estraro de UEA por protesti en nefermita letero al Stalin kontraŭ ties lingvistikaj teorioj.

SAT ja koncediś, ke en la klasa strukturo de la postmilita socio okazis ŝanĝoj kaj ke por la rilatoj kun UEA la klasa kriterio ne plu estas decida, ĉar en ambaŭ Asocioj troviĝas salajruloj, ke la skemo

UEA-burĝoj kaj SAT-laboristoj ne plu sufiĉas por adekvate priskribi la socian konsiston. Sed ĝi konfirmis la vokon „For la neŭtralismon!" kiel daŭre validan, nomis la anaron de UEA *„ĝenerale* pli burĝa kaj reakcia" kaj apelaciis al ĉiu „liberama, liberpensema, tolerema" esperantisto, sopiranta al „vere homeca socio", preni sian lokon en SAT, staranta plue sur la bazo de klasbatalo.

Ekde 1950 la Jarlibro eliras ne plu ĉiujare, sed regule ĉiun duan jaron. En 1952 reaperis — kiel ĉiujara 56-paĝa kajero — *Sennacieca Revuo,* kun valoraj studoj pri la historio de Esperanto, politikaj analizoj, kulturaj kaj literaturaj kontribuaĵoj daŭre atentindaj kaj la brilaj „Ridpunktoj" de Raymond Schwartz. En 1953 SAT prezentis sian *Historion,* kaj — en traduko de Waringhien — baldaŭ elĉerpitan volumeton, *Poemoj de Omar Kajam.* Kaj unu jaron poste estis senŝanĝe represita, en 3.000 ekzempleroj, *Plena Vortaro,* ĉi-foje kun — nova — suplemento.

Post kiam en 1952 perdiĝis la lastaj bastionoj de la orienteŭropa anaro (en Pollando kaj Ĉeĥoslovakio), en 1956 restariĝis kontaktoj kun Soveta Unio kaj aliaj socialismaj landoj; moskvaj esperantistoj sendis salut-telegramon al la 29-a Kongreso en Beograd. Sed baldaŭ montriĝis, ke konfiskado de SAT-eldonaĵoj ne estis ĉesigita, kaj reprezentantoj de la reorganiziĝanta esperantistaro bulgara, ĉeĥoslovaka kaj hungara rekomendis aliĝon al UEA, ne alprenante starpunkton pri SAT. La germanaj kamaradoj satiĝis je la — laŭ ili — „ovodanco" kun la neŭtraluloj, fondante Liberan Esperanto-Asocion sekve de la aliĝo de Germana Esperanto-Asocio al UEA. *Sennaciulo* atingis en 1955 3.800 abonantojn, *Sennacieca Revuo* 1.500. La traduka kapablo de Lanti estis remontrita per eldono de *Tri Verkoj de Volter* (Voltaire). Okaze de la 30-a Kongreso en Rotterdam (1957) unuafoje alta ŝtatisto partoprenis aranĝon de SAT: la nederlanda ĉefministro D-ro W. Drees. Kaj la tradicia fido al la junularo konkretiĝis, kiam la Junul-Fako komencis en 1958 eldoni sian bultenon *La Juna Penso.* La programon de la Kongresoj jam ekde 1954 regule eniris Infanaj Kongresetoj.

Sed la riĉigo je nova sango ankoraŭ ne kapablas kompensi la konstantajn perdojn — precipe pro morto de la pioniroj — kiujn spertas la Asocio ĉiujare. Pro malmultaj aliĝoj — nur kelkdekoj meznombre dum unu jaro — la membraro fine ekstagnadis sub la nombro de 3.000.

19.3.2 SAT kaj UEA

En la 87-a numero de *Sennacieca Revuo,* per kiu SAT omaĝis al la datreveno de siaj majstroj Zamenhof kaj Lanti (1959), Lucien Laurat pritraktis la strukturan ŝanĝon en la Esperanto-Movado,

montrante ke la „socia ŝtofo" de la anaro en SAT kaj UEA „estas larĝagrade identa: en ambaŭ organizaĵoj la laboruloj estas la plejmulto". La sola diferenco restas, „ke ĉe SAT-anoj ekzistas aŭ superregas socialista celkonscio, kiu forestas en la neŭtrala Movado". Ĉar kreskanta nombro da esperantistoj apartenas samtempe al SAT kaj UEA, „interbatalado inter ambaŭ organizaĵoj estus sensencaĵo, eĉ frenezaĵo".

Sed kunpuŝiĝoj tamen ankoraŭ okazis. En 1959, sekve de atakoj, i.a. de la prezidanto de unu Landa Asocio de UEA, kontraŭ SAT, la Asocio klopodis difini en komuna deklaro kun UEA la pozicion kaj celojn de ambaŭ organizaĵoj. La projekto fiaskis, ĉar SAT nomis „pretendo al hegemonio super la Esperantistaro" unu aldonon proponitan de la Estraro de UEA:

> U.E.A., sekve, celas la ĝeneralan enkondukon de la Internacia Lingvo en ĉiujn internaciajn rilatojn kaj kiel tia ĝi reprezentas la Esperanto-Movadon en la senco de la Bulonja Deklaracio, dum S.A.T. utiligas la lingvon por specialaj celoj simile al aliaj fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj uzantaj Esperanton.

Ankaŭ SAT apogis sin je la Deklaracio de Bulonjo, insistante ke ĝi „ne varbas *rekte* por Esperanto, kiel ekzemple UEA", sed ke „per konstanta uzado de la lingvo la SAT-anoj senĉese kontribuas *nerekte* al sukceso de la Esperanta afero".

Tiu ĉi incidenteto — la Estraro de UEA konfirmis, ke SAT ja agas konforme al la Bulonja Deklaracio, sed ke ĝi ne povas reprezenti la esperantismon en ĝia senco — refoje pruvis, ke la rilatoj inter SAT kaj UEA ankoraŭ ne perdis sian tiklecon. Dum UEA plurfoje etendis la manon al kunlaboro, SAT riproĉis al ĝi, ke „la tamburistoj de neŭtraleco fakte ne subtenas neŭtralismon, sed — UNESKO-ismon", kaj, konsekvence, rifuzis partopreni en la kolektado de subskriboj por la Peticio de UEA al Unuiĝintaj Nacioj. La faktan staton priskribis la Plenum-Komitato en sia raporto por 1967 jene: „... la rilatoj kun laŭdire neŭtralaj asocioj, grupoj k.a. restis — ĉefe komercaj, limiĝis al reciproka mendo de libroj". La estonta evoluo devos montri, ĉu la unuafoja partopreno de Prezidanto de UEA en SAT-Kongreso (1970) estos pli ol nur epizodo, same ĉu la kunlaboro de Jugoslavia Esperanto-Ligo, jam aliĝinta al UEA, helpos pliproksimigi la du Asociojn.

19.3.3 Nuna Situacio de SAT

Kvankam kontraŭdogma sinteno ĉiam estis proklamata kiel unu el la plej sanktaj idealoj de SAT, ĝiaj gvidantoj tamen persiste



Grupo de la partoprenintoj de SAT-kongreso en Gotenburgo (1928), inter kiuj troviĝis multaj konataj nomoj: Helmi Dresen kaj E. Drezen (la supra vico, dua kaj tria de maldekstre), M. Starr (la sama vico, la lasta dekstre), E. Lanti (la dua vico de supre, la lasta dekstre).



Parto de la partoprenintoj en la 42a Kongreso de SAT, Novi Sad, Jugoslavio, 1968.

obeas al kariĝinta principaro: Tial, ekz., *Sennaciulo* haltigis la opinio-interŝanĝon pri la eventoj en Ĉeĥoslovakio, „ĉar naciecaj konsideroj komencis superi en la debato la socipolitikajn aspektojn", kaj al la sama motivo kredeble ŝuldiĝas la ŝpara pritrakto de la vjetnama milito. Malpli timeme esprimiĝas la bulteno de la Junul-Fako, sed la fruktodona strečiteco, kiu kelkfoje karakterizas la rilatojn inter UEA kaj TEJO, tute mankas en SAT — pro la malforteco de la junula elemento. Eĉ diskuto pri generacia ŝanĝo ĝis nun apenaŭ leviĝis: La 76-jaran kunfondinton de SAT, Bannier, sekvis en 1969 kiel prezidanto la 68-jara J. Piron.

Inter 250 kaj 500 SAT-anoj ĉiujare partoprenas la Kongresojn, kun varia programo, i.a. prelegoj en Laborista Universitato kaj diskutrondoj. Plej ofte ili okazis en nord- kaj okcidenteŭropaj landoj, sed ankaŭ (dufoje) en Jugoslavio kaj (en 1962) denove en Vieno, kiam urbestro Jonas publike deklaris sin „sennaciulo". Hodiaŭ SAT kunlaboras, surbaze de la Gotenburga Konvencio, kun Laboristaj Esperanto-Asocioj en Britio, Danlando, franclingvaj kaj germanlingvaj regionoj, Nederlando, Svedio, Jugoslavio. Ekzemplon de kunlaboro kun neŭtralaj kaj aliaj neneŭtralaj organizaĵoj donas unu el la plej fortaj LEA-oj, la nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj, kiu ekde 1969 rezignis sian propran organon favore al *Komuna Esperanto-Gazeto*, ligilo de ĉiuj nederlandaj esperantistoj.

El landaj laboristaj Esperanto-gazetoj estas menciindaj *La Socialisto* (Aŭstrio), *La Libera Esperantisto* (Germanio), *Nia Voĉo* (Danlando), *SAT-Amikaro* (Francio) kaj *The Worker Esperantist* (Britio). Pro financaj konsideroj, la eldona agado lastatempe stagnis; la plej grava beletra verko dum la pasintaj jaroj estis *Vojaĝo al Kazohinio*, romano de Sándor Szathmári.

En 1968 SAT povis krediti al si imponan pruvon pri la solidariĝemo de sia restinta membraro. „Alarmo" en la januara numero de *Sennaciulo* savis la Asocion el la danĝero perdi sian parizan centron; la ricevo de la bezonataj 4.000 dolaroj permesis al ĝi jam post kelkaj semajnoj aĉeti la postkortan oficejon en Avenue Gambetta. Simile sukcesa, ĉi-foje ankaŭ pro la vasta reago de eksteruloj, estis la alvoko al subskripcioj por la monumenta *Plena Ilustrita Vortaro*, preparita de Waringhien dum jardekoj, longe sen firma espero pri la ebleco eldoni ĝin, sed fine publikigita en julio 1970. Ankaŭ en tiu ĉi kazo UEA kaj ĝiaj Landaj Asocioj helpis per varbado kaj kolektado de antaŭmendoj.

19.4 KONKLUDO KAJ PERSPEKTIVOJ

La signifo de SAT estas unuavice historia: En la socia krizo de la intermilita periodo ĝi elŝiris la laboristojn el la grandparte nemoviĝema neŭtrala Movado, postulante kiel unua celkonscian aplikon de Esperanto, nome ĝian utiligon por la klasbatalo. Same prava estis la principo, ke SAT devas sin teni sendependa de la partiaj disputoj en la internacia laborista movado. Sekve, SAT mirakle kreskis dum la unuaj jaroj de sia ekzisto, varbante al Esperanto multajn adeptojn, kiujn la neŭtralaj asocioj ne sukcesis gajni, kaj ludante elstaran, ĉiam memorindan rolon en la formiĝo de internacilingva kulturo.

Sed en la 1930'aj jaroj, sub ekstera premo kaj pro internaj eraroj, SAT komplete ŝanĝiĝis. Post la foriro de anarkistoj, komunistoj kaj socialdemokratoj ĝi perdis sian supertendencan karakteron, kiu restis nura fikcio, ĉar pli kaj pli anstataŭis ĝin aparta ideologio: la sennaciismo de Lanti, kiu ne kapablis krei — kiel vidis Jonas jam en 1932 — organizan fundamenton por la internacia laborista Esperanto-Movado. SAT infektiĝis per la malnova esperantista malsano: la kredo, ke Esperanto, garnita per kelkaj mondŝanĝemaj tezoj, povas per si mem ludi rolon reforman aŭ eĉ revolucian. Tiamaniere ĝi senigis sin de ĉia influpovo je sindikatoj, socialistaj partioj kaj progresema junularo, kiuj konsideras SAT ne ideologia kunbatalanto kontraŭ socia maljusteco, sed, en plej bona okazo, kiel premgrupon por Esperanto, kun sektaj trajtoj apenaŭ akordigeblaj kun scienca socialismo.

Aliflanke, la vero estas, ke unu el la ĉefaj elementoj de marksismo estas la internacia solidareco de la laborista klaso super la limigoj, kiujn necese kaŭzas la ekzisto de nacioj kaj naciaj lingvoj. Kredi, ke tia internacia solidareco de la laborulaj amasoj povas formiĝi kaj fortikiĝi aŭtomate, nur surbaze de esence identaj ekonomiaj strukturoj, sed sen fakta ebleco de rekta komunikado inter la laboristoj de malsamaj nacioj kaj lingvoj, estas ne malpli naive, ol fidi, ke adopto de Esperanto per si mem povas solvi la sociajn problemojn. Tial, same riproĉindaj estas la laboristaj partioj, sindikatoj, internaciaj unuiĝoj kaj kulturaj institucioj, kiuj ankoraŭ ne komprenis — aŭ, eble, en kelkaj okazoj tro bone komprenis — la rolon de la Internacia Lingvo kiel supernacia, simpla instrumento de lingva komunikado por la laboristoj kaj sekve faris nenion aŭ nur tre malmulte por vastigi la scion de Esperanto en tiuj medioj. Nur la forigo de ambaŭ starpunktoj, egale naivaj, malfermos la pordon por vastaj kontaktoj inter diversnaciaj laboristoj kaj tiel kontribuos al la formiĝo kaj evoluo de internacia solidareco de la laborulaj amasoj.

Unu el la veteranoj de SAT, Mark Starr, parolante pri la politika naiveco de multaj esperantistoj, kritikis en Augsburg, ke SAT-anoj, havante sian parton de stranguloj en la Esperanto-Movado, ne nur ignoras la agadon en lokaj Esperanto-kluboj, sed ankaŭ la laboron en la propraj sindikat-organizoj. Efektive, novajn fortojn SAT rekrutas maksimume el aliaj Esperanto-asocioj, sed ne el laboristaj rondoj rekte, kaj la novmembriĝoj tenas balancon kun la membroperdoj. Laŭ efiko kaj amplekso de agado, jam nun SAT ne povas mezuri sin ekz. kun Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, kaj estas dubinde, ĉu la membronombro ankoraŭ longe pravigos ĝian pretendon esti la dua ĉefa Esperanto-organizaĵo internacia post UEA.

Rigardante al sia 50-a datreveno, la gvidantoj de SAT ne kaŝis iom da seniluziiĝo („ni ne havas motivon por triumfi kaj etendi nin sur laŭroj"), fierante „pri la nura fakto, ke la 50 jaroj ne forskrapis nian aparaton, nian movadon, ke SAT nuntempe prezentas pli grandan unuecon idean ol en la tempesta periodo inter la du mondmilitoj". Kiu komparas la progreson de SAT, kiam kunekzistis en ĝi diversaj skoloj, kun ĝia nuntempa stato, tiu ne povas ne skeptike sin demandi, ĉu la atingita „unueco idea", t.e. sennaciismo, efektive estas gajno por la Asocio.

19.5 BIBLIOGRAFIO

Andrejev, A.; L. Ĵirkov, k.a. *Al la nova etapo.* Leipzig 1932.

Artjuŝkin-Kormilicyn, V. P., *Meĵdunarodnyj jazyk revoljucionnogo proletariata Esperanto.* Peterburg 1919.

Bartelmes, N., „Lanti en siaj lastaj vivojaroj". *Sennacieca Revuo,* 1955, n-ro 83, p. 2-5.

———, „Vojaĝo tra la pensomondo de E. Lanti". *Sennacieca Revuo,* 1970, n-ro 98, p. 1-7.

Becker, Diethelm, *Der Arbeiter-Esperanto-Bund auf dem Weg zu einer revolutionären Organisation des deutschen Proletariats.* Tezo, Universitato de Rostock. 1968.

Blanke, D., „Pri la historio de la internacia laborista Esperanto-Movado". *Paco,* vol. 12, 1969, n-ro 187/188, p. 34-35.

de Bruin, G. P., *Laborista Esperanta Movado antaŭ la Mondmilito.* Parizo 1936.

Caubel, André, „Universala lingvo kaj kosmopolitismo en la 18-a jarcento". *Sennacieca Revuo,* 1956, n-ro 84, p. 2-12.

Chapelier, Émile, kaj Gassy Marin, *„Les anarchistes et la langue internationale „Esperanto".* Paris 1907.

Drezen, E., *Analiza historio de Esperanto-Movado.* Leipzig 1931.
———, „Nuntempa stato, perspektivoj kaj plua evoluo de laborista Esperanto-Movado". *Kvardek jaroj... de Esperanto.* Paris-Leipzig-Moskvo 1927, p. 28-36.
Ejdelman, B., kaj N. Nekrasov, *Problemoj de laborista esperantismo.* Leipzig 1930.
Elsudo, V. (V. Kolĉinski), *A.B.C. de sennaciismo.* 2-a eld. Paris-Leipzig 1926.
Historio de S.A.T. 1921-1952. Paris 1953.
Historio pri la skismo en la laborista Esperanto-Movado. Paris 1935.
Iodko, A. R., *Raboĉij klass i meĵdunarodnyj jazyk.* 2-a eld. Moskva 1925.
Izgur, E., *Organizo de internacia solidareco. Internacia lingvo je la servo al proletaro.* Kremenĉug 1928.
(Jonas, Franz) „Vortoj de Prezidanto Jonas". *Kontakto,* vol. 7, 1970, n-ro 4, p. 7-8.
Kalendaro de IPE, 1933. Berlin.
Kirjuŝin, P., *Meĵdunarodnaja raboĉaja svjaz' na Esperanto.* Moskva 1930.
Kloek, A., *Het Esperanto en de arbeidersbeweging.* Amsterdam 1922.
Kolev, P. A., *Meĵdunarodnijat ezik i rabotniĉeskata klasa.* Sofia 1922.
Kongreso de Revoluciaj Esperantistoj... Amsterdam, la 5-an de aŭgusto 1931. Berlin 1931.
Laisant, C. A., *L'internationalisme et la classe ouvrière.* Paris (antaŭ 1914).
Lanti, E. (E. Adam), *For la neŭtralismon!* 3-a eld. Paris-Leipzig 1928.
———, *La laborista esperantismo.* Paris-Leipzig 1928.
———, *Naciismo. Studo pri deveno, evoluado kaj sekvoj.* Leipzig 1930.
———, *Vortoj de kamarado Lanti.* Leipzig 1931.
———, *Absolutismo.* Paris-Amsterdam 1934.
———, *Leteroj de E. Lanti.* Paris 1940.
———, *Manifesto de la sennaciistoj* kaj *Dokumentoj pri sennaciismo.* 2-a eld. Paris 1951.
Laurat, Lucien, „Rimarkoj pri la tutmondeco kaj la klasaj celoj de S.A.T.". *Sennacieca Revuo,* 1959, n-ro 87, p. 42-46.
Laval, R., *Bref aperçu sur le mouvement espérantiste ouvrier.* Manuskripto. 1956.
Legrand, René, *Le prolétariat et la langue internationale.* Paris (post 1919).
Lins, Ulrich, „Lenin kaj Esperanto". *Esperanto,* vol. 63, 1970, n-ro 7/8, p. 108-111.

Miyamoto masao, „Leteroj de Lanti ĉe mi". *Sennacieca Revuo*, 1966, n-ro 94, p. 35-37.
Podkaminer, S. N., „Lenin kaj Esperanto". *Der Esperantist*, vol. 5, 1970, n-ro 42, p. 2-8, 17-22.
„Skiza historio de la laborista Esperanto-Movado". Ivan Sarafov, *Legolibro*. Sofia 1946, p. 55-67.
Stalin, J., *Kulturo nacia kaj internacia*. Trad. G. Demidjuk. Leipzig 1930.
Takasugi iĉiro, „Esperanto kaj la internaciismo". *Kongresa Universitato de 38-a Japana Kongreso*. Nagoja 1951, p. 3-13.
Waringhien, Gaston, „Eŭgeno Lanti". *Eseoj I, Beletro*. La Laguna 1956, p. 99-103.
Werner, P., *Der deutsche Arbeiter und die Welthilfssprache Esperanto*. Hannover 1913.
Wissenswertes für die Arbeiterschaft über die Esperanto-Bewegung. Leipzig 1926.
Jarlibroj de SAT. Protokoloj de SAT-Kongresoj. Revuoj: *Internacia Socia Revuo, Esperantista Laboristo, Sennacieca Revuo, La Nova Epoko, Sennaciulo, Libera Laboristo, La Socialisto, Internaciisto, Sur Posteno, La Nova Etapo, Internacia Kulturo, Paco*.
Vidu ankaŭ la bibliografiojn de ĉapitroj 14 kaj 21.

ĈAPITRO 20

INSTITUCIOJ

20.1 AKADEMIO DE ESPERANTO

20.1.1 Unua Periodo

20.1.1.1 *Lingva Komitato.* — Al la 1-a UK en Bulonjo (1905) Zamenhof prezentis planon por la organizo de la Movado: en ĝi, apud reganta „Centra Komitato" el 25 membroj, estis proponitaj i.a. unu 15-membra „Komitato de la Lingvo" kaj unu 25-membra „Komitato de Ekzamenistoj". Sub la influo de De Beaufront kaj Cart la kongreso decidis starigi „Komitaton simple lingvan kun D-ro Zamenhof kiel prezidanto, por konsiliĝi kun li pri ĉiuj demandoj rilataj al la lingvo". Zamenhof, ne volante alpreni mem povon de elektado, proponis, ke eniru en tiun Komitaton la redaktoroj de la pli gravaj Esperantaj gazetoj, la prezidantoj de la pli gravaj societoj kaj la pli konataj esperantistoj; oni tiel atingis la nombron de 102 membroj el 26 nacioj, kaj Boirac estis elektita kiel efektiva prezidanto.

En la 2-a UK en Ĝenevo (1906) Zamenhof petis, ke la LK, kiu estis elektita provizore nur por unu jaro, fariĝu definitiva komitato kaj la prezidanto Boirac konservu sian funkcion. Tiu peto estis sankciita de la kongreso.

20.1.1.2 *Fondiĝo de Akademio.* — Tiel grandnombra kaj disloka komitato ne povis praktike labori; tio aparte evidentiĝis ĉe la Idokrizo en 1908. Jen kial je tiu dato la prezidanto proponis formi „Superan Komisionon aŭ Akademion" el maksimume 18 membroj, kun la sama estraro kiel la LK, kaj starigi kvar konstantajn komi-

sionojn por Komuna Vortaro, Gramatiko, Teknika Vortaro kaj Internaj Aferoj. Fine li prezentis „Deklaron pri la Rolo de la LK", kiu komenciĝis jene: „La tasko de la LK estas zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evolucion. Ĝi do esploras ĉiujn lingvajn demandojn kaj solvas ilin laŭ la supreditaj principoj. Neniel la Fundamento nek la LK povas esti baro por la normala evolucio de la lingvo, kiun ili, kontraŭe, certigas." Ĉiuj tiuj proponoj kaj la Deklaro estis aprobitaj de la 4-a UK en Dresdeno (1908).

Interne de la LK, Boirac voĉdonigis „Regularon", kiu ricevis kelkajn modifojn en 1912; la ĉefa punkto estis, ke „la anoj de la LK estas elektitaj de la LK mem, per absoluta plimulto de la voĉdonantoj, inter kandidatoj, kies liston preparas la Akademio" (Art. 4). En 1935 la prezidanto Rollet-de-l'Isle voĉdonigis novan tekston, aranĝitan en „Statutaro" kaj „Interna Regularo"; la ĉefa novaĵo estis, ke la Akademio ne plu „eltiras el la proponitaj kandidatoj la esperantistojn, kiujn ĝi juĝas indaj fariĝi anoj de la LK", sed ke ĝi limigas sin je la listigo de la kandidatoj, kiujn prezentas „la esperantistaj societoj, la anoj de la LK, aŭ eĉ kiu ajn esperantisto, kiu ankaŭ rajtas prezenti sin mem". Samtempe pro la kreskanta nombro de la LK-anoj (116) li decidiĝis limigi ilian nombron je 100.

20.1.1.3 *Funkcioj.* — Dum tiu unua periodo prezidantoj de la lingvaj institucioj estis sinsekve:
1905-17: Emile Boirac (1851-1917). Post lia morto kaj pro la Unua Mondmilito okazis interrompo en la funkciado de la lingvaj institucioj.
1920-31: Théophile Cart (1855-1931);
1931-33: John Mabon Warden (1856-1933);
1933-37: Maurice Rollet-de-l'Isle (1859-1943);
1937-39: Johannes R. C. Isbrucker (1889-1967).
La direktoroj de la sekcioj estis:
(i) Por la Komuna Vortaro: T. Cart (1908-12); ĉe tiu dato Cart fariĝis „ĝenerala Direktoro por la Vortaro", helpata de L. Elb, poste E. Grosjean-Maupin por la „komuna vortaro" kaj de Ch. Vérax por la „teknika"; ekde 1920 la situacio renormaliĝis kun la direktoroj E. Grosjean-Maupin (1920-34), L. Bastien (1934) kaj W. Bailey (1935-39).
(ii) Por la Teknika Vortaro: R. de Saussure (1912) kaj, post la komuna regado de Cart, P. Corret (1920-22), M. Rollet-de-l'Isle (1922-32), L. Bastien (1933-36), L. Helleboid (1937-39), ĉi-lasta ne-LK-ano.
(iii) Por la Gramatiko: A. Grabowski (1908-21), W. Lippmann (1924-36), A. Cseh (1937-40).
(iv) Por jenaj, ne konstantaj sekcioj, nome pri Internaj Aferoj: G. Moch (1908-11); pri Propraj Nomoj: G. Moch (1907-10); pri Vort-

farado: R. de Saussure (1911-19); pri Elparolo kaj Premioj: E. Privat (1924-27); pri Kontrolo: M. Rollet-de-l'Isle (1931-39).

20.1.1.4 *Konsisto.* — La Supera Komisiono aŭ Akademio konsistis en 1908 el 12 membroj: Bein, Boirac, Cart, Ellis, Evstifejeff, Grabowski, Moch, Mybs, Nylén, de Saussure, Villanueva kaj Wackrill, reprezentantaj resp. la lingvojn francan (4), anglan, polan (po 2), germanan, hispanan, rusan kaj svedan (po 1). Post la interrompo de la Unua Mondmilito ĝi konsistis el 15 membroj: Cart, Christaller, Corret, Evstifejeff, Grabowski, Grosjean-Maupin, Inglada, Kühnl, Lengyel, Mybs, Nylén, Privat, de Saussure, Wackrill, Warden, reprezentantaj resp. la lingvojn francan (5), anglan, germanan (po 2), ĉeĥan, hispanan, hungaran, polan, rusan kaj svedan (po 1). Fine en 1939 ĝi konsistis el 16 membroj: Baghy, Bailey, Bastien, Belmont, Cseh, Grau-Casas, Inglada, Isbrucker, Lippmann, Minor, Nylén, Rollet-de-l'Isle, Schmid, Setälä, Stamatiadis, Waringhien (kaj unu sekretario-kasisto, neakademiano, R. de Lajarte), reprezentantaj resp. la lingvojn francan, germanan (po 3), hungaran (2), anglan, finnan, grekan, hispanan, katalunan, nederlandan, polan kaj svedan (po 1).

20.1.1.5 *Eldonaĵoj.* — Propraj verkoj de la Akademio, oficiale agnoskitaj de la LK, estas nur:
(i) La 6 *Oficialaj Aldonoj* al la UV: la 1-a, preparita de Cart, voĉdonita en 1909 kaj entenanta 864 radikojn kun tradukoj en la franca, angla, germana, rusa kaj pola; la 2-a, preparita de Grosjean-Maupin sub la nomo de Cart, voĉdonita en 1919 kaj dividita en du partoj; (a) internaciaj vortoj, sen tradukoj, sed kun montro de la gramatika kategorio: 480 radikoj; (b) komune uzataj vortoj: 111 radikoj kaj du kunmetaĵoj, kun tradukoj en la franca, angla kaj germana — sume 591 radikoj, plus la sufikso -ism; la 3-a, preparita de Grosjean-Maupin, voĉdonita en 1921 kaj same dividita: (a) propre esperantlingvaj radikoj: 61; (b) internaciaj radikoj: 131, sume 192, ĉiuj kun tradukoj en la angla, franca, germana, hispana, portugala, itala kaj pola; la 4-a preparita de Grosjean-Maupin, voĉdonita en 1929 kaj entenanta nur unu liston de 118 radikoj, kun la tradukoj en la franca, angla kaj germana, plus la prefikso mis-; la 5-a, preparita de Bastien, voĉdonita en 1934 kaj prezentanta du listojn: (a) oficialaj vortradikoj: 5; (b) teknikaj vortradikoj: 3 — sume 8, ĉiuj kun tradukoj en la angla, franca, germana, hispana, itala kaj pola; la 6-a, preparita de Bailey, voĉdonita en 1935 en du listoj: (a) oficialaj vortradikoj: 15; (b) teknikaj vortradikoj: 6 — sume 21 kun tradukoj en la samaj ses lingvoj.
(ii) La kvin partoj de la „Korektoj pri Eraraj Tradukoj en la UV", voĉdonita en 1922-23.

Ĉiuj aliaj verkoj, ĉu ili aperis en la „Kolekto de la Akademio", ĉu aliloke, estis nur privataj verkoj de apartaj akademianoj aŭ LK-anoj.

20.1.1.6 *Financoj.* — La tuta laborado de la lingvaj institucioj ĝis 1922 estis ebligita kaj pagita de la CO de Sebert: en ties *Oficiala Gazeto Esperantista* aperis la jaraj raportoj, la raportoj de la sekcioj aŭ komisionoj ktp. Post la morto de Sebert, la LK suferis je manko de rimedoj por eldono aŭ eĉ funkciado, kaj la situacio pliboniĝis nur post la starigo de la „Internacia Centra Komitato", poste de IEL, kiu ĉiujare difinis subvencion. Al ĝi aldoniĝis kelkaj maloftaj donacoj de privatuloj: tio ebligis, inter 1926 kaj 1938, la publikigon de 12 jarlibroj kaj, inter 1929 kaj 1933, de ses „Oficialaj Bultenoj".

20.1.2 Dua Periodo

20.1.2.1 *Kunfandiĝo.* — La cirkulero n-ro 19 havas la daton de junio 1939, la n-ro 20 la daton de marto 1946: ĉi tiu estis fakte nur voko al ĉiuj antaŭmilitaj LK-anoj, ke ili donu signon de vivo kaj montru sian deziron pri plua kunlaboro. El la 102 membroj de 1939 respondis 48 — kaj tiu sola fakto montras, kian rompon la milito kaj ĝiaj sekvoj faris en la funkciado de la lingvaj institucioj. Isbrucker opiniis la situacion taŭga por funda reorganizo, kiu forigus la ĝenan kaj temporaban duoblecon inter la LK kaj ĝia Akademio. Li do proponis novan statuton, kiu, post multaj diskutoj kaj modifoj, estis fine voĉdonita la 20-an de julio 1948.

20.1.2.2 *Nova Statuto.* — La ĉefaj ŝanĝoj estis: (i) La LK kaj ĝia Akademio kunfandiĝas en unu solan korpon, nomatan „Akademio de Esperanto" (art. 1). (ii) La nombro de akademianoj estas prefere ĉ. 40, sed ĝi ne povas esti pli ol 50 (art. 3). (iii) Kandidatojn por la Akademio povas proponi ĉiu esperantista organizaĵo kaj ĉiu unuopa esperantisto, kiu ankaŭ povas proponi sin mem (art. 8). (iv) Povas esti kreataj „Konsilantaj Komitatoj de la Akademio", organizitaj sur teritoria, nacia, nacilingva aŭ faka bazo, sub la gvidado de unu aŭ pluraj akademianoj, por helpi al la laboroj de la Akademio (art. 17-20).

Tiu Statuto kun la paso de la jaroj montriĝis neoportuna pri la tri lastaj punktoj: (i) Ne estis antaŭvidita konstanta rilato inter la nombro de la akademianoj kaj ilia potriona rebalotado ĉiun trian jaron (en 1963 la tri trionoj konsistis resp. el 14, 5 kaj 21 anoj!). (ii) La facileco de proponado okazigis multiĝon de la kandidatoj, inter kiuj vane kaj danĝere dividiĝis la voĉoj, tiel ke oni devis plurfoje rekomenci la baloton kaj multaj estis elektitaj aŭ rifuzitaj per

unu sola voĉo. (iii) Disponante nek pri sekretario nek pri buĝeto, neniu akademiano povis starigi Konsilantan Komitaton. Aliflanke Isbrucker emis regadi ĉion sola: li jam kunigis la funkciojn de prezidanto kaj sekretario-kasisto, sed volis krome fariĝi direktoro de la sekcio pri la Komuna Vortaro. Tiel li sola decidis pri la buĝeto, la spezoj ktp., kaj, kun la helpo de malgranda rondo, ankaŭ pri la aranĝo kaj difinoj de la entreprenita „Oficiala Vortaro". Fine li, sen voĉdonigi en la Akademio, provis trudi ĝianome sian starpunkton pri la participa demando. Renkontinte ĉiam pli da rezisto, li iom post iom ĉesis interesiĝi pri la agado de la Akademio, kiu, lasite sen laborplano, baldaŭ plu ekzistis nur surpapere, per periodaj elektoj de novaj membroj. Eĉ tiuj elektoj fariĝis pli kaj pli neregulaj: tiuj, kiuj devis okazi en 1955, estis simple forgesitaj; tiuj de 1958 okazis nur kun unu jaro da malfruiĝo, kaj tiuj de 1961 devis esti ripetitaj pro malobservo de la Statuto. Cetere, la estraro ne plu estis reelektita ekde 1950.

20.1.2.3 *Renoviĝo.* — Jen kial en la privata kunsido de la Akademio dum la UK en Kopenhago pluraj membroj prezentis la kandidatecon de nova estraro, kun Waringhien kiel prezidanto, Bokarev (poste, pro lia rifuzo, Collinson) kaj Neergaard kiel vicprezidantoj kaj Albault kiel sekretario. Tiu propono provokis grandan polemikon, kaj baldaŭ estis kontraŭprezentita alia listo, kun Lippmann kiel prezidanto, Vilborg kiel vicprezidanto kaj Støp-Bowitz kiel sekretario. Isbrucker tiel aranĝis la balotadon, ke sekvis fortaj protestoj. Rezulte, la Akademio decidis, per 24 voĉoj, por nuligo de la balotado, 10 estis kontraŭ. Ĉe la nova balotado Waringhien ricevis 22 voĉojn kaj Lippmann 15.

20.1.2.4 *Funkcioj.* — Dum tiu dua periodo la prezidanto de la Akademio estis ĝis 1963 J. R. C. Isbrucker, kaj ekde tiu dato Gaston Waringhien.

Direktoroj de la sekcioj estis denove elektitaj nur en 1951. De tiam ili estis sinsekve: Por la Ĝenerala Vortaro G. Waringhien (1951-65), A. Albault (1965-). Por la Gramatiko W. Lippmann (1951-65), D. B. Gregor (1965-71), H. A. de Hoog (1972-). Por la Teknikaj Vortaroj J. Okamoto (1951-56), R. Haferkorn (1958-). Por la Bibliografio P. Neergaard (1951-). Por la Literaturo G. Avril (1951-53), I. Rotkvić (1954-65), W. Auld (1965-). Sekcio pri Prononcado estis kreita en 1958 laŭ la propono kaj sub la gvidado de C. Støp-Bowitz. Sekretario-kasisto estis Isbrucker mem ĝis 1963, poste A. Albault (1963-65) kaj ekde 1965 R. Bernard.

20.1.2.5 *Verkoj.* — Aktoj de la Akademio ĝis 1963 estis: (i) Oficialigo de la sufikso *-end* (julio 1953), (ii) la 7-a Oficiala Aldono al la UV (decembro 1958), preparita de Waringhien.

La Aktoj de la Akademio ekde 1964 estis: voĉdono de reviziita, pli racia Statuto; esplorado de la demando pri la pasivaj partic ipoj kaj rekonfirmo de la zamenhofa sistemo; esplorado de la demando pri la vortfarado pendanta ekde 1913 kaj oficialigo de la bazaj principoj de tiu vortfarado, esplorado de la demando pri la uzado de la refleksivoj; esplorado de la konsisto de Baza Radikaro Oficiala k.a.

20.1.2.6 *Financoj.* — La elspezoj de la Akademio estis kovritaj per konstanta subvencio de UEA, per oftaj subvencioj de SAT (1955, 1959-63, 1966) kaj per okazaj subvencioj de Sveda Esperanto-Federacio (1952), de Brazila Esperanto-Ligo (1958-60) kaj de la nederland-flandra Federacio de Laboristaj Esperantistoj (1964-66).

20.2 CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO (CED)

20.2.1 Fondiĝo

En la januara numero de *Esperanto*, 1952, aperis informo pri la fondiĝo de Centro de Esploro kaj Dokumentado. En artikolo, kiu klarigis la celojn de la nova institucio, estis, interalie, dirite, ke por efike progresigi la aferon de la Internacia Lingvo necesas aldoni multe da scioj al la jam ekzistantaj vervo kaj entuziasmo.

Efektive, en 1950, post la transdono de la Peticio al la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj, montriĝis, ke nek entuziasmo kaj sindono, nek la sendubaj atingoj de Esperanto sur diversaj kampoj sufiĉas, se oni ne povas pruvi la faktojn per fidindaj dokumentoj, studoj kaj analizoj. Estis klare, ke ĝuste tiaj pruvoj estos bezonataj por sukcesigi la Peticion kaj entute por apogi kiun ajn seriozan paŝon en la estonteco ĉe mondaj aŭ regionaj internaciaj instancoj, aŭ ĉe ŝtataj kaj aliaj aŭtoritatoj. Tiam ankaŭ evidentiĝis, ke praktike ne ekzistas facile havigeblaj precizaj informoj, eĉ ne pri la plej elementaj faktoj, kiujn oni povus rigardi kiel ĝenerale bone konatajn (ekzemple pri la programoj de la universalaj kongresoj), por ne paroli pri aliaj. En multaj kazoj oni ja sciis pri iu evento, sed komplete forestis ĉiuj detaloj. En aliaj kazoj, se entute estis troveblaj informoj,

ili estis tiel kaŝitaj en arkivoj kaj diserigitaj, ke apenaŭ oni povis rekonstrui difinitan fakton. La solaj verkoj, kiuj povis helpi en kelkaj rilatoj, estis *Bibliografio de Internacia Lingvo*, kompilita de P. E. Stojan, kaj *Enciklopedio de Esperanto*, redaktita de L. Kökény kaj V. Bleier (ĉefredaktoro I. Ŝirjaev), sed la unua aperis en 1929, la dua en 1933-35, do ambaŭ jam delonge ĉesis esti ĝisdataj. Preskaŭ komplete mankis sciencaj studoj pri la lingva problemo en la mondo, fidindaj statistikoj rilatantaj al la Esperanto-Movado, ktp. Krome, la havigeblaj informoj pri la sama evento aŭ fakto ofte entenis gravajn malsamecojn rilate detalojn, aŭ eĉ kontraŭdirojn, en diversaj fontoj.

En tiaj kondiĉoj Prof. D-ro I. Lapenna proponis al la Estraro kaj Komitato de UEA fondon de institucio, kies celo estus plenigi la vakuon. Samtempe estis prezentita skizo de la programo, kiun kaj la Estraro kaj la Komitato akceptis dum la UK en Munkeno (1951). Tuj post tio komenciĝis intensaj preparlaboroj (detaligo de la laborplano, kunlaborantoj, bazaj financaj rimedoj, necesaj presaĵoj ktp.). Ili estis kompletigitaj en decembro 1951, kaj la 1-an de januaro 1952 ekfunkciis Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) kiel institucio de UEA. Kiel honorofica direktoro estis elektita Prof. D-ro I. Lapenna, kiu ekde tiam seninterrompe gvidis tiun institucion.

Pro diversaj kaŭzoj, sed ĉefe por adapti la nomon de CED al ĝiaj aktualaj taskoj kaj laboro, en 1968 la nomo estis ŝanĝita al *Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo*, sed la mallongigo jam fariĝis tiel populara, ke la institucio estas plu ĝenerale konata kiel CED.

20.2.2 Celo kaj Organizo

La celo kaj laborsistemo de CED ne estis formulitaj en aparta statuto aŭ regularo, sed en speciala dokumento, kiu enhavis la bazajn principojn de agado kaj indikis la atingotajn celojn.

Laŭ tiu dokumento, CED havas trioblan celon: sciencaj esploroj, dokumentado kaj informado.

Sciencaj esploroj rilatas al lingvistikaj kaj sociologiaj studoj pri la Internacia Lingvo kaj ĝiaj multflankaj aplikoj en ĉiuj sferoj de la vivo; psikologiaj kaj sociologiaj studoj pri la moralaj kaj intelektaj efikoj, kiujn kaŭzas la praktika uzado de la Internacia Lingvo; esplorado de la eblecoj por plua utiligo de la lingvo precipe sur la kampoj de scienco kaj arto, intelektaj interŝanĝoj, trafiko kaj komerco.

Dokumentado koncernas kolektadon de gravaj dokumentoj pri la Internacia Lingvo ĝenerale kaj pri la Esperanto-organizaĵoj; prizorgon de studoj kaj disertacioj; ellaboradon de statistikoj.

20.2 CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Informado rilatas al utiligo de la kolektitaj dokumentaj materialoj por verkado de artikoloj, kunmetado de tipaj prelegoj por diversaj okazoj, pretigado de apogaj dokumentoj; partoprenado en ĉiuj medioj, kiuj pritraktas la problemon de komuna lingvo; interŝanĝado de informoj kaj dokumentoj kun Unesko, UN kaj aliaj gravaj internaciaj organizaĵoj; liverado de dokumenta materialo al la landaj kaj fakaj asocioj.

Ekde la komenco la organizo estis intence establita kiel tre elasta, sen rigidaj reguloj, administraj komplikaĵoj, formalaj kunsidoj kaj kunvenoj, kiuj nur ĝenus la efikecon. La ideo estis kaj restas havigi al la Movado por la Internacia Lingvo elstaran institucion kun kvalifikitaj kunlaborantoj, kiu, unuflanke, kolektas dokumentan materialon pri ĉiuj aspektoj de la lingva problemo en internaciaj rilatoj, kaj aliflanke utiligas tiun materialon por apogi la klopodojn celantajn vastigi la uzon kaj la praktikajn aplikojn de la lingvo.

La organiza strukturo estas tre simpla: honorofica direktoro (aŭ direktoro, se la financaj rimedoj iam permesos tion), nomata de la Komitato de UEA, kunlaborantoj kaj tradukantoj, helpo de sekretariino por prizorgi la administradon.

Kunlaboranto povas fariĝi nur persono kvalifikita kaj kompetenta por difinita tasko, ĉu laŭ sia propono, ĉu laŭ la invito de la direktoro. La kunlaborantoj plenigas kaj subskribas apartan slipon, en kiu troviĝas, interalie, indikoj pri la profesio kaj okupo, specialeco, universitataj titoloj, sciencaj gradoj kaj fakaj distingoj; hejma lingvo kaj kono de aliaj lingvoj; personaj rilatoj en sciencaj, artaj, politikaj, komercaj kaj aliaj medioj; aparteno al gravaj naciaj aŭ internaciaj organizaĵoj; ligoj kun nacilingvaj fakaj revuoj kaj gazetoj. En la slipo troviĝas aparta rubriko, en kiu la kunlaboranto indikas kiun laboron li aŭ ŝi pretas plenumi por CED. Tiamaniere en la oficejo oni havas precizan superrigardon pri ĉiuj necesaj elementoj. En ĉiu momento la direktoro povas sin turni precize al tiu aŭ tiuj kunlaborantoj, kiuj povas plej bone plenumi la konkretan bezonatan laboron.

La nombro de kunlaborantoj variis inter 25 kaj 96. En 1972 CED havis 71 kunlaborantojn en 22 landoj. Inter la forpasintaj sciencistoj, kiuj estis kunlaborantoj de CED kaj multe helpis al ĝia laboro per siaj elstaraj kontribuoj, aparte menciindaj estas Prof. D-ro G. Canuto, Prof. J. C. Flügel, Prof. St. Kamarýt, Prof. D-ro E. Privat, Prof. D-ro H. Sirk, Prof. D-ro W. E. Collinson.

La buĝeto de CED estas tre malalta. Tiu por 1973 atingas precize 900 anglajn pundojn. En 1971 la tuto de elspezoj estis 858 pundoj. La elspezoj estas kovrataj parte el subvencioj de UEA, aliparte el

donacoj. Ekzemple, en 1971 la subvencio de UEA estis 515 pundoj, kaj la donacoj 282 pundoj, dum la resto estis kovrita el la pozitiva saldo de la antaŭa jaro. CED povis plenumi siajn taskojn per tiuj pli ol modestaj financaj rimedoj dank' al la fakto, ke la honorofica direktoro kaj ĉiuj kunlaborantoj, inkluzive la tradukantojn, laboras senpage, dum la helpa sekretariino ricevas malgrandan kompenson.

Ekde la fondiĝo ĝis novembro 1955 la oficejo de CED estis en 300 West End Lane, Londono, N.W. 6. Post tio ĝi troviĝis kaj plu troviĝas en 77 Grasmere Avenue, Wembley en la t.n. Granda Londono. La teknika oficejo, kiu prizorgas multobligon de dokumentoj, presigon kaj aliajn teknikajn-administrajn laborojn, troviĝas ĉe la CO de UEA en Rotterdam.

La jaraj raportoj pri la laboro de CED kaj ĝiaj jaraj laborplanoj estas regule publikigataj en la *Jarlibro* de UEA, Dua Parto. Okazaj raportoj aperas en la revuo *Esperanto,* en la rubriko de CED.

20.2.3 Studoj kaj Dokumenta Materialo

La tuta dokumenta materialo, kiun kolektas CED, konsistas el speciale verkitaj studoj de diversaj kunlaborantoj; esploroj pri specialaj temoj, enketoj kaj statistikoj; bibliografioj; diversaj dokumentoj.

Jen la ĉefaj rezultoj atingitaj sur tiu kampo:

(i) *Studoj:* Entute la kunlaborantoj de CED verkis ĉ. 70 specialajn studojn, kiuj rilatas al multaj temoj, ekzemple la lingva problemo en internaciaj rilatoj, problemo de komunikado en la mondo, la lingva demando en eŭropaj institucioj, aspektoj de la lingva demando en internacia kaj kompara juro, la demando de teknikaj kaj sciencaj terminaroj, la eduka valoro de Esperanto-instruado en la lernejoj, Esperanto kiel literatura lingvo, kaj multaj aliaj.

(ii) *Esploroj, enketoj kaj statistikoj:* Estas farita tuta aro da laboroj en tiu sfero. Aparte menciindaj estas la granda statistiko pri la nombro de personoj sciantaj la Internacian Lingvon (1952); la enketoj pri la socia konsisto de la Esperanto-Movado kaj la enketo pri la socia konsisto de la universalaj kongresoj; enketoj pri la Esperantaj libroj en publikaj bibliotekoj; ses grandaj enketoj pri la instruado de Esperanto en lernejoj (la du lastaj en kunlaboro kun ILEI, v. Ĉap. 4.6.3); enketoj pri la Esperanto-Societoj, Esperantlingvaj resumoj kaj artikoloj en nacilingvaj revuoj; statistikoj pri la Esperantaj radio-elsendoj, pri Esperantaj prospektoj kaj reklamoj, pri stratoj kaj placoj kun la nomoj „Esperanto" aŭ „D-ro Zamenhof", pri poŝtmarkoj kaj poŝtaj stampoj kun teksto en Esperanto, ktp. La lasta enketo, farata en 1972 kaj ankoraŭ ne finita, rilatas al la

nombro de partoprenintoj en kongresoj, konferencoj kaj aliaj internaciaj renkontiĝoj kun Esperanto kiel la sola oficiala lingvo.

(iii) *Bibliografioj:* Ĉiujare estas ellaborata bibliografio pri la Esperanto-publikaĵoj. Pluraj kunlaborantoj ellaboris specialajn bibliografiojn pri publikaĵoj rilate la Internacian Lingvon en siaj resp. landoj.

(iv) *Kolekto de Dokumentoj:* Ĉiuj dokumentoj, kiuj povus en kiu ajn senco helpi al la laboro de CED, estas regule kolektataj kaj katalogataj en aparta sliparo. Ĝis novembro 1972 estis tiamaniere kolektitaj, ordigitaj kaj katalogitaj entute 4.360 dokumentoj. Ĉ. 1.200 slipoj entenas ankaŭ ĉ. 5.400 erojn el diversaj periodaĵoj kaj aliaj fontoj.

20.2.4 Publikaĵoj

Kompreneble, CED ne limigas sian laboron al la nura kolektado de studoj kaj dokumentaj materialoj, sed utiligas tiujn fontojn por siaj publikaĵoj.

Inter la publikaĵoj unuavice estas menciinda la *Dokumentaro pri la Internacia Lingvo Esperanto*, kiu seninterrompe aperas ekde 1952. La dokumentoj estas eldonataj laŭ la Ĝenerala Plano, ellaborita komence de 1952. Laŭ tiu plano, ĉiuj dokumentoj publikigataj por la internaj bezonoj de la Esperanto-Movado havas la signon CED/INT. En tiu serio entute aperis 61 dokumentoj. La dokumentoj, eldonitaj por specialaj okazoj, havas la signon CED (por la esperantaj eldonoj) aŭ RDC (por la lingvoj angla kaj franca; simile por aliaj lingvoj). En tiu serio estas eldonitaj 13 dokumentoj, el kiuj la pliparto tre grandaj, kutime kun presita kovrilo, en la lingvoj Esperanto, angla, franca, hispana, pluraj ankaŭ en la itala, dana, germana, nederlanda, norvega, sveda, portugala, pola kaj aliaj lingvoj. Aparte menciindaj estas la Dok. CED/3, eldonita okaze de la Unesko-Konferenco en Parizo; CED/4, publikigita okaze de la Unesko-Konferenco en Montevideo; CED/5 okaze de la 70-jara datreveno de Esperanto; tri dokumentoj CED/6 okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof; CED/7, eldonita okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro. Tiu lasta dokumento kun la titolo *Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo (Esperanto)*, verkita de la direktoro de CED, atingis ĝis la fino de 1972 16 eldonojn en 13 lingvoj: Esperanto, angla (3), franca, hispana, itala, japana, nederlanda, norvega, pola, hebrea (2), portugala, germana kaj serba. Ĉiu nova eldono estis ĝisdatigita kaj kompletigita.

La nombro de aliaj dokumentoj laŭ la serioj estis:

Serio A (La Internacia Lingvo Esperanto) entute 48 dokumentoj en 7 sekcioj; Serio B (La Instruado de Esperanto) entute 21 doku-

mentoj en 6 serioj; Serio C (La Monda Organizo de la Esperanto-Movado) entute 19 dokumentoj en 6 sekcioj; Serio D (La Esperanta Literaturo) entute 31 dokumentoj en 4 sekcioj; Serio E (La Esperanta Faka kaj Scienca Literaturo) entute 8 dokumentoj en 5 sekcioj; Serio F (La Esperantaj Revuoj kaj Gazetoj) entute 3 dokumentoj en 3 sekcioj; Serio G (Kulturaj Manifestacioj) entute 58 dokumentoj en 6 sekcioj; Serio H (Formoj de Praktika Aplikado) entute 9 dokumentoj en 5 sekcioj; Serio I (Rolo de Esperanto por Evoluigo de Internacia Solidareco) entute 49 dokumentoj en 7 sekcioj; Serio J (Rolo de Esperanto por Faciligo de Internaciaj Politikaj, Profesiaj, Fakaj kaj Aliaj Rilatoj) entute 5 dokumentoj en 5 sekcioj.

Entute, do, en la Serioj A-J aperis 251 dokumentoj, en la Serio CED 13 dokumentoj, en la Serio CED/INT. 61, sume 325 dokumentoj. Se oni prenas en konsideron la tradukojn de multaj dokumentoj en diversaj naciaj lingvoj, la tuto transpasas 360 dokumentojn ĝis novembro 1972. El ili, multaj havis po 10, 16 aŭ eĉ pli da paĝoj. Pluraj dokumentoj estis studoj verkitaj de diversaj kunlaborantoj, inter kiuj elstaras tiuj de W. Auld, Marjorie Boulton, I. Dratwer, Inĝ. A. R. Haferkorn, Drs. G. F. Makkink, R. Markarian, D-ro P. Neergaard, Prof. J. Régulo-Pérez, D-ro W. P. Roelofs, D-ro V. Sadler, Prof. G. Waringhien, aldone al la studoj verkitaj de la direktoro kaj de la supre menciitaj forpasintaj kunlaborantoj.

La dokumentoj de CED estas regule sendataj al diversaj interŝtataj kaj privataj internaciaj organizaĵoj, al la plej gravaj bibliotekoj, al pluraj sciencaj institutoj. Ofte la dokumentoj servis kiel bazo por verkado de nacilingvaj studoj kaj artikoloj, en kelkaj kazoj ankaŭ por doktoraj disertacioj.

CED verkis ankaŭ apartajn dokumentojn, kiuj ne estis publikigitaj, sed liveritaj al la koncerna instanco. El tiuj sendube la plej grava estis la speciala *Raporto pri la Internacia Lingvo Esperanto*, verkita en 1953 kaj liverita al la Sekretariato de Unesko kelkajn monatojn antaŭ la Konferenco en Montevideo. La Raporto havis entute, kune kun la aldonaj dokumentoj kaj statistikaj tabeloj, 250 dense tajpitajn paĝojn. Alia grava dokumentaro estis liverita fine de 1953 al la norvega parlamentano Carl Henry, por ke li povu apogi sian proponon al la Norvega Nobel-Komitato, ke UEA ricevu la Nobel-Pacpremion, kion li efektive faris en januaro 1954. La menciita dokumentaro, iom ampleksigita, aperis libroforme en 1954.

La Monda Lingvo-Problemo (LMLP) estas internacia, interdisciplina revuo por la pristudo de la lingva problemo en ĉiuj ĝiaj aspektoj: socia, lingvistika, politika, jura, psikologia, ekonomika. La redakta komitato konsistas el 12 specialistoj pri diversaj branĉoj, kaj la respondeca redaktoro estas D-ro V. Sadler, en daŭra kontakto

kun la direktoro de CED. La revuo estas eldonata de la mondfama Mouton & K-io, Hago, sub aŭspicio de CED. LMLP estas publikigata tri fojojn jare kaj ĉiu kajero havas 64 paĝojn. Aperas originalaj artikoloj en diversaj naciaj lingvoj kun resumoj en la internacia.

Antaŭ ol komenci la publikigon CED sukcesis kolekti la sumon de ĉ. 20.000 gld. por garantii la aperon de la unuaj numeroj.

Ĝis novembro 1972 entute aperis 3 kompletaj volumoj de 9 numeroj, kaj unu numero de vol. 4. La revuo estas abonata de bibliotekoj, fakultatoj, institutoj kaj unuopuloj. Ĝi ĝuas altan reputacion.

Gravaj publikaĵoj de CED aperis libroforme aŭ kiel grandaj broŝuroj. La unua libro estis *La Internacia Lingvo (Faktoj pri Esperanto)*, redaktita kaj parte verkita de la honorofica direktoro. La libro havas 192 paĝojn. Ĝi aperis en 1954.

Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro, redaktita de la honorofica direktoro kaj samtempe sekretario de la Internacia Organiza Komitato por la memorigo de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, estis eldonita en 1960. Ĝi enhavas multajn kontribuojn de kunlaborantoj de CED, ampleksan trarigardon pri la celebrado de la Zamenhof-Jaro en la mondo, dokumenton de Unesko pri la oficialigo de la 100-jara datreveno kaj multajn ilustraĵojn el la vivo de Zamenhof kaj pri la celebrado. Pro la elstaraj artikoloj kaj multnombraj faktoj, kiujn ĝi entenas, la verko estas plu aktuala. Ĝi havas 104 grandformatajn paĝojn kaj 16 paĝojn da ilustraĵoj.

En 1964 CED faris enketon pri la lokaj Esperanto-societoj: iliaj nombro, adresoj, tagoj de kunvenoj ktp. La rezultoj de tiu enketo aperis en la *Jarlibro*, 1965, Dua Parto, kaj poste kiel aparta broŝuro de 72 paĝoj sub la titolo *Listo de Lokaj Esperanto-Societoj*. La broŝuro entenas informojn pri 1.299 lokaj Esperanto-societoj en 39 landoj. Ĝia celo estas ebligi internaciajn kontaktojn inter ili, interŝanĝon de prelegantoj kaj programoj, fortikigon de internacia solidareco.


En 1970 aperis *Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj*, verkita de Mag. Isaj Dratwer, multjara kunlaboranto de CED. La 142-paĝa verko enhavas dirojn kaj opiniojn de filozofoj, verkistoj, scienculoj, filologoj, lingvistoj kaj aliaj famaj personoj ĉu pri la lingva demando en la mondo ĝenerale, ĉu aparte pri la Internacia Lingvo. Dua, kompletigita eldono estas planita.

En 1971 CED eldonis la materialojn de la debato, okazinta dum la UK en Londono, sub la titolo *La Problemo de Lingva Komunikado en la Nuntempa Mondo*. Ĝi estas depresaĵo el LMLP, vol. 3, n-ro 9, 1971. La 48-paĝa broŝuro entenas la kontribuojn de la partoprenintoj en la debato („forumo") en la originalaj lingvoj, nome en angla, franca, germana kaj Esperanto, en la kazo de naciaj lingvoj



Théophile Cart (1855-1931): Elstara rolo en la lingvaj institucioj de la frua periodo.





La londona oficejo de CED: Gravaj iniciatoj kaj laboroj sur tute nova agadkampo.

Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, fondita en 1929, estas grava ekstermovada institucio.

kun ampleksaj resumoj en la internacia. En la fino estas aldonita dokumento en la angla *Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo (Esperanto)*, kompilita de CED. La dokumentaro, entenata en la broŝuro, servis kiel bazo por la diskutoj pri la sama demando, okazintaj meze de 1972 en Frostavallen, en la kadro de la seminario Sveda Somera Semajno.

Ĉi tie estas menciinda la nuna volumo, kiu prezentas la kronon de multjara funkciado de CED kaj ĉiuflankaj kontribuoj de ĝiaj kunlaborantoj.

La laboro rilatanta al *Enciklopedio de Esperanto*, iniciatita antaŭ kelkaj jaroj, kontentige progresas. Fine de 1972 oni ankoraŭ ne povas antaŭvidi la daton de ĝia apero, ĉar certe necesos ankoraŭ pluraj jaroj antaŭ ol povos esti finpretigita la manuskripto. CED aŭspicias la verkon. Ĉefredaktoro estas U. Lins kaj redaktoro R. Haupenthal.

20.2.5 Aliaj Laboroj

CED plenumas ankaŭ aliajn taskojn depende de la konkretaj bezonoj. Ekzemple, ĝi kolektis la materialojn kaj organizis la tutan *Universalan Ekspozicion pri la Internacia Lingvo*, kiu estis unue elmontrita en Montevideo okaze de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, kaj certe estis unu el la decidaj faktoroj, kiuj kontribuis al la akcepto de la konata Rezolucio de la 10-a de decembro 1954. La sama Universala Ekspozicio estis poste elmontrita en Strasburgo, Kopenhago, Mainz, Varsovio, Nederlando, parte en Harrogate kaj en aliaj landoj. Ĉie ĝi estis efika pruvo pri la kulturaj valoroj kreitaj en la Internacia Lingvo kaj pri la praktikaj servoj, kiujn ĝi prezentas. La materialoj de la ekspozicio nun troviĝas en la domo de UEA en Rotterdam; ili estas daŭre kompletigataj.

CED regule liveras al Unesko precizajn informojn pri la traduka Esperanto-literaturo kaj tiuj informoj estis utiligataj por la gravega verko *Index Translationum*. En la bazo de ĉiuj grandaj agadoj kaj kampanjoj de UEA ekde 1952 ĉiam troviĝis specialaj dokumentoj de CED, pretigitaj por la konkreta evento.

Per sia regula kaj konstanta agado CED tutcerte estis unu el la ĉefaj elementoj, kiuj ebligis la firmigon de la pozicio de la Internacia Lingvo en diversaj sciencaj kaj ĝenerale kulturaj centroj de la mondo. Krom tio, CED ĉiam estis kaj plu estas je dispono de la Esperanto-Movado por apogi per dokumentitaj pruvoj kaj argumentoj konkretajn agadojn.

20.3 INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO KAJ BIBLIOTEKOJ

20.3.1 Unuaj Iniciatoj

Multaj Esperanto-asocioj kaj individuaj libroamantoj formis tre frue siajn bibliotekojn, en kiuj estis kaj estas konstante kolektataj libroj, gazetoj, broŝuroj kaj aliaj esperantaĵoj. La plej bonajn rezultojn en tiuj klopodoj sendube atingis Brita Esperantista Asocio, kies biblioteko, prizorgata dum multaj jaroj de Mor.agu C. Butler (1884-1970), estas unu el la plej bonaj tiaspecaj institucioj en la mondo. Jam antaŭ la Unua Mondmilito la Ruso Georg Davidov (1879-1967) iĝis konata pro sia granda kolekto de la unuaj Esperantaj eldonaĵoj.

Mankis, tamen, institucio kun internacia karaktero, en kiu estus kolektita ĉio kreita en Esperanto kaj pere de ĝi. Tial, dum la 19-a Universala Kongreso en Danzig (1927), Felix Zamenhof (1868-1933), la frato de Ludoviko, faris la proponon establi ie en la mondo internacian Esperanto-bibliotekon. Unu el la ĉeestintoj en Danzig, la aŭstra fervojisto Hugo Steiner (1878-1969), decidis rezigni sian profesion kaj plene dediĉi sin al realigo de tiu ideo. Li ricevis la apogon de la aŭstria kanceliero Ignaz Seipel, tiel ke en aprilo 1928 oni disponigis al Steiner provizoran laborlokon en iama ĉevalejo kun malgranda tablo, du seĝoj kaj forneto. Tiu ejo jam baldaŭ montriĝis multe tro malgranda, ĉar Steiner dekomence celis kolekti kaj konservi la tutan materialon pri Esperanto kaj pri la dumjarcentaj klopodoj solvi la lingvan problemon, por tiel sur scienca bazo montri al la mondo la disvastiĝon de la Internacia Lingvo.

Steiner komprenis, ke li ne povos realigi la planon en plena amplekso nur per libervolaj kontribuoj fare de la esperantistoj (kvankam ili malavare subtenis), kaj tial venis al la ideo, ke la plej bona solvo de la problemo estus instali la Muzeon sub ŝtata administrado, kiu prezentus sekurecon por ĝia daŭra ekzistado kaj evoluado. Post intertraktadoj kun la Ĝenerala Direktoro de Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno, Steiner sukcesis atingi, interkonsente kun la Ministerio pri Edukado, konvenan kontrakton (septembro 1928), per kiu la Muzeo estis alligita al la Biblioteko por „eterna tempo" kiel speciala fako. La ŝtato devigis sin senpage disponigi la necesajn ejojn, pagi la bindigon de la volumoj kaj havigi la rimedojn por laŭorda administrado.

20.3.2 Starigo de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien (IEMW)

Fine de 1928 la Federacia Prezidento de Aŭstrio, Wilhelm Miklas, transprenis la protektadon de la Muzeo, kaj la 1-an de aŭgusto 1929 okazis la solena inaŭguro de IEMW, en ĉeesto de la Prezidento, Kanceliero, Instruministro, pluraj eminentuloj kaj pli ol 600 esperantistoj. Miklas deklaris, ke IEMW „certe estas destinita ludi gravan rolon en la spirita vivo de la popoloj". En 1930 la Muzeo translokiĝis en salonegon de la Nova Imperiestra Kastelo, kaj du jarojn poste ĝi ricevis plian grandan salonon.

Ĝis siaj lastaj vivotagoj Steiner estis senlaca laboranto por Esperanto kaj sia Muzeo. La fondo de IEMW kaj la posta multjara laboro alportis al li la titolon „Kortega Konsilisto". Ĉar li estis iom tro aŭtokrata laŭ sia karaktero, forgesiĝis la kunlaborantoj, sen kiuj li ne estus atinginta siajn celojn. Unuavice necesas nomi du personojn: Gustav Weber, lia unua helpanto, kiu pro sia aktivado por Esperanto estis arestita de la naziaj okupantoj en 1938 kaj mortis sekve de kruela traktado en koncentrejo en aprilo 1945; kaj Rudolf Michael Frey (1885-1949), tre agema, sed modesta homo. Pro la fakto, ke Steiner, politike tre konservativa homo, preterlasis interkonsiliĝi kun ĉiuj reprezentantoj de la aŭstria Esperanto-Movado, la forta laborista ligo sub Franz Jonas decidis bojkoti la Muzeon.

Kiam Hitler aneksis Aŭstrion, IEMW estis fermita kaj ĝia direktoro enkarcerigita. La materialon oni tamen povis savi, ĉar ĝi estis ĝustatempe deponita en la kastela kelo.

Tuj post la liberiĝo, en 1945, la Muzeo ricevis novan hejmon en la Kastelo: kvin salonegojn. Ekde oktobro 1949 la Muzeo ricevas ĉiujaran subvencion de la Ministerio pri Edukado; en 1950 ekaperis, kvarfoje jare, la bibliografie utila *Informilo de IEMW,* kaj komence de junio 1951 okazis inaŭguro de „Panteono" por la pioniroj de la mondlingva ideo, kiun denove ĉeestis reprezentantoj de la publika vivo de Aŭstrio. En 1957 kaj 1958 aperis duvoluma Katalogo pri la kolektoj de IEMW, kies matricojn, por 554 paĝoj, Steiner skribis mem. Alfabetan katalogon li sukcesis verki nur ĝis la litero L, ĉar la 1-an de aŭgusto 1969 ĉesis la longa vivo de unu el la plej konataj esperantistoj.

La nuna Direktoro de la Muzeo estas (ekde 1965) la diplomita bibliotekisto D-ro Walter Hube, kiu laboras en IEMW jam de 1958. Liaj kunlaborantoj estas unu dungito kaj du nepagataj sekretariinoj.

La biblioteko ampleksas nuntempe proksimume 14.000 volumojn. Interesiĝantoj en Eŭropo povas havigi al si verkojn el IEMW pere de ĉiu pli granda loka biblioteko.

20.3.3 Aliaj Bibliotekoj

Bonaj Esperanto-Bibliotekoj troviĝas, krome, en pluraj aliaj landoj. La plej ampleksa biblioteko estas tiu de Brita Esperantista Asocio, kun proks. 33.000 registritaj titoloj. La Bulgara Nacia Biblioteko *Kiril i Metodi* en Sofio registris proks. 11.500 librojn, kaj la Biblioteko Hector Hodler apartenanta al UEA en Rotterdam, registris ĉ. 10.000 volumojn.

Proks. 4.700 titoloj troviĝas en Prago, 3.500 en Ottawa, 3.000 en Bologna, 3.000 en Tokio (Japana Esperanto-Instituto), 3.000 en la Universitata Biblioteko de Amsterdam, 2.800 en la Germana Ŝtata Biblioteko en orienta Berlino, 2.800 en la biblioteko de UFE en Parizo, 2.500 en Montevideo, 2.500 en Szeged (Hungario), 2.000 en la biblioteko de SEF en Stockholm, 1.200 en Malmö, pli ol 1.000 en Buenos Aires, Fortaleza (Brazilo), Rio de Janeiro, 1.000 en Zürich, Toruń (Pollando) kaj La Chaux-de-Fonds (Svislando). Riĉaj kolektoj de interlingvistika literaturo troviĝas ankaŭ en la Bavara Ŝtata Biblioteko (Munkeno) kaj en pluraj universitataj bibliotekoj de F R Germanio, precipe en Kolonjo, Munkeno, Saarbrücken kaj Frankfurto.

En ligo kun la preparlaboroj por la dua eldono de *Enciklopedio de Esperanto* estas prilaborita kompleta katalogo de la interlingvistika literaturo en la bibliotekoj de FR Germanio.

20.3.4 Katalogoj

Aimola, Hellevi, „Suomen esperantokirjallisuuden luettelo". *Bibliophilos*, 1959, n-ro 2, p. 21-40. — Katalogo pri la Esperanta literaturo en la Universitata Biblioteko de Helsinki.

Catalogi kunsttalen. Esperanto. Catalogus van de boekerij der Nederlandse Esperantisten-Vereniging „La Estonto Estas Nia" en van de Esperanto-collectie in de Universiteitsbibliotheek. Du partoj. Amsterdam 1969.

Davidov, Georg, *Katalogo de la Biblioteko. Majo 1887- Majo 1908.* Berlin 1908

———, *Bibliografio. I. Katalogo de la Biblioteko (1881-1911).* Wolfenbüttel 1911.

Gyuris György, *Katalogo de la Hungarlanda Esperanto Biblioteko,* Szeged 1967.

Haupenthal, Reinhard, „Planlingva literaturo en germanaj bibliotekoj". *Informilo de IEMW*, vol. 21, 1970, n-ro 2 (78), p. 4-5.

Steiner, Hugo, *Katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien.* Du partoj. Wien 1957-58.

———, *Alfabeta katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien.* Parto I. Literoj A-L. Wien 1969.

La Esperanta libraro de Kobe Urba Universitato de Fremdaj Studoj. Kobe 1972.

20.4 INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO (ISU)

20.4.1 Komenciĝoj kaj Nuna Organizo

Jam en la jaro 1925 oni venis al la ideo, ke estus bone utiligi la universalajn kongresojn de Esperanto ankaŭ por diskonigo de la akirajoj de la scienco. Tiucele estis organizitaj prelegoj de fakuloj pri diversaj temoj. La 17-a Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo (1925) efektive enhavis serion da prelegoj, kiujn oni nomis „Somera Universitato".

La tiamaj klopodoj havis iom improvizitan karakteron. Oni ne sukcesis krei firman institucion, bazitan sur sciencaj principoj kaj koncerne la temaron kaj koncerne la personojn de la prelegantoj. Ne ekzistis statuto, kiu reguligus tiujn demandojn.

Post la Dua Mondmilito estis renovigitaj la klopodoj. En 1949 la Komitato de UEA diskutis la demandon. Rezulte, estis akceptita Regularo pri la Internacia Somera Universitato (ISU).

Laŭ Art. 1 de la Regularo, ISU estas speciala kultura institucio de Universala Esperanto-Asocio. Ĝia celo estas popularigi ĉiujn sciencajn kaj artajn branĉojn pere de la Internacia Lingvo kaj evoluigi la Esperantan sciencan kaj priartan literaturon. ISU funkcias regule dum la UK, sed la Estraro de UEA rajtas decidi, ke ĝi okazu ankaŭ aliloke, ekster la kadro de la UK.

En ISU povas prelegi universitataj profesoroj kaj aliaj kvalifikitaj personoj, kiuj havas la rajton instrui en universitatoj aŭ en samrangaj lernejoj laŭ la leĝoj de siaj landoj. Escepte, en ISU povas prelegi ankaŭ rekonitaj fakuloj pri sciencaj aŭ artaj temoj, sed ilia nombro devas ne superi la nombron de lekciistoj kvalifikitaj por supera instruado (Art. 2). Entute, ekde 1948 ĝis la fino de 1972 en la 25 sesioj de ISU lekciis 91 profesoroj, docentoj kaj aliaj kvalifikitaj lekciistoj.

Komence de ĉiu sesio la lekciistoj elektas la rektoron de ISU por unu jaro, t.e. ĝis la sekva sesio. Inter la rektoroj de ISU, ekde la akcepto de la Regularo, troviĝis pluraj scienculoj mondfamaj en siaj respektivaj fakoj, ekzemple Prof. D-ro H. Badalić, membro de Jugoslavia Akademio de Scienco kaj Arto en Zagreb (Jugoslavio); Prof. D-ro C. C. Berg de la Universitato de Leiden, membro de la Reĝa Nederlanda Scienca Akademio; Prof. H. L. Elvin, direktoro de Instituto pri Edukado en la Universitato de Londono, estinta direktoro de la Departemento pri Edukado de Unesko; Prof. D-ro M. Roost

de la Universitato de Bruselo; Rektoro K. Söderberg, Uppsala; Prof. D-ro G. Canuto, rektoro de la Universitato en Parma; Prof. Inĝ. Vasil Peevski, ĉefo de la Katedro de Geodezio en Sofio; Prof. D-ro Tadeusz Kotarbiński, prezidanto de Pola Akademio ĉe Sciencoj; Prof. D-ro V. Väisälä, estinta prezidanto de la Scienca Akademio de Finnlando; Prof. D-ro M. Sancho-Izquierdo, Hon. Rektoro de la Universitato de Zaragoza (Hispanio), k.a.

Alia funkciulo de ISU estas la konstanta sekretario, kiun la Estraro de UEA nomas por la periodo de tri jaroj. Laŭ la Regularo, la konstanta sekretario estu universitata profesoro aŭ rajtigita instrui en universitatoj aŭ en samrangaj lernejoj laŭ la leĝoj de sia lando. La unua konstanta sekretario de ISU estis Prof. D-ro Ivo Lapenna, kiu plenumis tiun taskon dum pluraj jaroj. La nuna konstanta sekretario estas D-ro Victor Sadler, B.A. (psikologio eksperimenta) de la Universitato de Cambridge, doktoro pri eksperimenta fonetiko de la Londona Universitato.

La rektoro prezidas la koncernan sesion de ISU kaj, kune kun la konstanta sekretario, reprezentas ISU antaŭ ĉiuj sciencaj kaj kulturaj institucioj, kaj antaŭ la ŝtataj kaj internaciaj aŭtoritatoj dum la periodo de sia ofico. La ĉefa tasko de la sekretario estas organizi la sekvan sesion de ISU. En interkonsento kun la rektoro, li submetas ĉiujn anoncitajn prelegojn al la Estraro de UEA por aprobo. Surbaze de la faritaj proponoj kaj de la eventualaj rimarkoj de la konstanta sekretario aŭ de la rektoro, la Estraro fiksas la programon de la sekva sesio.

Inter 1948 kaj 1972 inkluzive okazis 25 sesioj de ISU. La unua sesio estis en Malmö (Svedio) en 1948, la dua en Bournemouth (Britio) en 1949, la tria en Parizo en 1950, la kvara en Munkeno (F.R. Germanio) en 1951, la kvina en Oslo (Norvegio) en 1952, kaj ĉiun sekvan jaron en la urboj de la UK ĝis Beograd (Jugoslavio) en 1973.

20.4.2 Lekcioj en Tri Branĉoj

La nuntempa ISU havas tri ĉefajn branĉojn: sociaj sciencoj kaj filozofio, naturaj sciencoj, arto kaj literaturo.

20.4.2.1 *Sociaj Sciencoj kaj Filozofio.* — En tiu ĉi branĉo 47 lekciistoj faris entute 106 lekciojn. Plej multe da lekcioj, entute 21, faris Prof. D-ro I. Lapenna, antaŭe profesoro pri internacia juro kaj internaciaj rilatoj en la Universitato de Zagreb, ekde 1973 katedra profesoro en la Universitato de Londono; sekvas laŭ la nombro de prelegoj la forpasinta Prof. D-ro G. Canuto, antaŭe rektoro de la Universitato en Parma, ĝis la forpaso profesoro en la Universitato de Torino kaj direktoro de la Instituto pri Kriminologio en Torino,

kiu faris 7 lekciojn. Same tiel la forpasinta Prof. D-ro W. E. Collinson faris 7 lekciojn en tiu ĉi branĉo. Prof. L. Laurat, forpasinta en 1973, faris 5 lekciojn.

Por doni ioman bildon pri la varieco de lekcioj en tiu ĉi branĉo, jen kelkaj ekzemploj:

Prof. D-ro C. C. Berg (Leiden, Nederlando) lekciis pri „Kial la Popoloj Estas Diferencaj"; Prof. D-ro E. Bokarev, vicdirektoro de la Lingvoscienca Instituto de Sovetunia Scienca Akademio, lekciis pri „Fonemo kaj Sono en Esperanto", „Hipotezo de Lingva Unueco de la Antikva Mediteranea Regiono" kaj pri aliaj temoj; Prof. D-ro G. Canuto lekciis pri pluraj juraj kaj jurmedicinaj problemoj, interalie pri eŭtanazio, „mensogdetektilo", stratakcidentoj; Prof. D-ro W. E. Collinson (Universitato de Liverpool) faris lekciojn pri etimologiaj demandoj kaj pri la teorio de pruntvortoj, kiel ankaŭ pri la gramatika strukturo de la angla kompare kun tiu de Esperanto; Prof. H. L. Elvin, direktoro de la Instituto de Edukado en la Universitato de Londono, lekciis pri „La Angla Edukado kiel ĝi Estas Vidata de Eksterlando"; Ambasadoro Ralph Harry (Aŭstralio) lekciis pri „La Internacia Reĝimo de Antarkto"; Prof. D-ro I. Lapenna faris aron da lekcioj pri internacia juro, la Internacia Kortumo, la jura signifo de la Universala Deklaracio, la fundamentaj elementoj de federacia ŝtato, la maro en internacia juro, k.a.; Prof. L. Laurat (Parizo) lekciis pri evolufazoj de la monda ekonomio, la nunaj aspektoj de la Eŭropa ekomomio kaj pri aliaj demandoj en la sfero de ekonomikaj sciencoj; Prof. D-ro E. Privat (Svislando) lekciis pri la usona kaj svisa federacioj kaj aliaj temoj; Prof. D-ro J. Régulo-Pérez (Kanariaj Insuloj) lekciis pri la hispana kontraŭ la prakanariaj lingvoj kaj aliaj temoj; Prof. D-ro G. Sevak (Universitato de Erevan) liveris lekcion pri „La Devena kaj Pruntfonta Parenceco inter la Armena Lingvo kaj Esperanto"; Rektoro K. Söderberg (Uppsala) lekciis pri demokrata edukado kaj popolaj altlernejoj; D-ro J. C. Wells (Universitato de Londono) lekciis pri demandoj en la sfero de fonetiko, interalie pri „Konfliktaj Postuloj por la Fonetiko de Internacia Lingvo".

20.4.2.2 *Naturaj Sciencoj.* — En tiu ĉi branĉo 22 lekciistoj liveris 58 lekciojn. Prof. D-ro Hugo Sirk (Vieno) lekciis 10 fojojn; D-ro C. Støp-Bowitz (Oslo) faris 8 lekciojn; D-ro Paul Neergaard (Kopenhago) lekciis 5 fojojn en tiu ĉi branĉo, sed faris 3 lekciojn ankaŭ en la branĉo de sociaj sciencoj, filozofio kaj lingvoj; Prof. Inĝ. O. Pancer (Zagreb) lekciis 6 fojojn; sekvas laŭ la nombro de lekcioj Prof. D-ro Hideo Yagi (Okayama-Universitato, Japanio) kaj Prof. D-ro Vasil Peevski (Sofio), kiuj faris po 4 lekcioj.

Jen kelkaj ekzemploj por ilustri la temaron:

Prof. D-ro David L. Armand (Moskvo) lekciis pri „Racia Uzado kaj Konservado de la Naturfontoj"; Prof. D-ro Jonas Dagys (Ŝtata Universitato de Vilnius, Litova SSR) parolis pri „Distribuo kaj Dinamiko de Bios-Vitaminoj en Superaj Plantoj"; Prof. D-ro F. Egami (Universitato de Tokio kaj membro de la Japana Scienca Konsilantaro) lekciis pri „Kio Estas la Molekula Biologio?" kaj „Neorganika Biologia Kemio de Nitrogeno"; Prof. D-ro Erkki Kääriäinen (Geodezia Instituto de Finnlando) pritraktis la temon „Pri la Formo kaj Grando de la Terglobo"; Prof. D-ro R. A. Lewin (Oceanologia Instituto Scripps, Universitato de Kalifornio) lekciis pri „Plumbo en la Aero"; Prof. D-ro Knut Lundmark (Universitato de Lund, Svedio) pritraktis astronomian temon sub la titolo „Astronomiaj Sensacioj"; D-ro P. Neergaard (privata docento, dumtempa profesoro en la Universitato de Beirut, Libano) dediĉis nombron da lekcioj al la protektado de plantoj; Prof. Inĝ. O. Pancer (Universitato de Zagreb) liveris plurajn lekciojn pri demandoj rilatantaj al agrikulturo kaj agronomio; Prof. D-ro V. Peevski (Teknika Altlernejo de la Universitato de Sofio) lekciis pri la „Celoj kaj Signifo de la Nuntempa Katastro"; Prof. D-ro B. Popović (Universitato de Sarajevo, Jugoslavio) pritraktis la eblecojn kaj malfacilaĵojn de interplaneda vojaĝado, la ŝancojn por la homo vivi sur alia planedo kaj pri la lingva problemo en matematikaj kaj fizikaj sciencoj; Prof. D-ro Hugo Sirk (Universitato de Vieno) liveris plurajn prelegojn pri problemoj rilatantaj al molekuloj kaj atomoj; Doc. D-ro C. Støp-Bowitz (Universitato de Oslo) pritraktis en siaj lekcioj la estiĝon de la homo, parencecon inter vertebruloj kaj plurajn aliajn temojn sur la kampo de biologiaj sciencoj; Prof. D-ro Hideo Yagi (Universitato de Okayama, Japanio) lekciis pri la „Domaĝo de la Atombombo en Postaj Jaroj", „Valoro de Esperanto por Internacia Evoluo de Medicino" kaj aliaj temoj.

20.4.2.3 *Arto kaj Literaturo.* — Entute 29 lekciistoj faris 66 lekciojn en tiu ĉi branĉo. Prof. G. Waringhien (Parizo) lekciis 16 fojojn; Prof. Reto Rossetti (Bristol) 6 fojojn; Prof. D-ro Stojan Ĝuĝev (Sofio) kaj kelkaj aliaj lekciis 4 fojojn.

Ankaŭ en tiu ĉi branĉo la temaro estis tre varia:

Mag. William Auld (Glasgow) dediĉis siajn lekciojn ĉefe al literaturo: „Perspektivoj de la Esperanto-Poezio", „La Evoluo de la Esperanta Poezio", „Kompara Literaturo — Ĉu Ebla Studobjekto?"; Mag. Marjorie Boulton (Pedagogia Seminario en Ambleside, Anglio) lekciis pri semantikaj demandoj, metaforoj, klišoj kaj slangoj; Prof. D-ro Stojan Ĝuĝev (Ŝtata Muzikakademio, Sofio) faris plurajn prelegojn pri demandoj sur la kampo de muziko; Prof. D-ro Edmond Privat (Universitato de Neuchâtel, Svislando) lekciis pri „Tolstoj kaj Gandhi",

„Orienta kaj Okcidenta Kulturoj"; Prof. D-ro J. Régulo-Pérez (Universitato de La Laguna, Kanarioj) lekciis pri „Mitaj kaj Legendaj Kanarioj"; Prof. R. Rossetti (Universitato de Bristol) prelegis pri la artistoj de la itala renesanco, „Otelo — la plej Pasia Amtragedio de Shakespeare", „Britaj Pentristoj de la 18-a kaj 19-a Jarcentoj"; Rektoro Karl Söderberg (Uppsala, Svedio) lekciis pri „August Strindberg — Sveda Verkisto kun Mondfamo"; D-ro H. Tonkin (Universitato de Pennsylvania, Usono) lekciis pri „La Angla Renesanco kaj ĝia Poezio" kaj „Reĝo Lear kaj la Universaleco de Shakespeare"; Prof. G. Waringhien (Parizo) liveris nombron da prelegoj pri internaciaj poeziaj formoj, Esperanto kaj tradukarto, la Esperanta leksikologio, H. Heine, kaj aliaj temoj rilatantaj al literaturo kaj leksikologio.

Entute, do, okazis 230 lekcioj en la tri branĉoj. Sep el la lekciistoj faris lekciojn en du branĉoj, tiel ke la nombro de la lekciistoj estas 91, kiel indikite supre. Pluraj el la lekcioj aperis libroforme, aliaj estis publikigitaj en diversaj periodaĵoj, unuavice en *Scienca Revuo* kaj *Internacia Jura Revuo*.

20.5 INSTITUCIO HODLER 68

20.5.1 Fondiĝo kaj Principoj

Ekde la plej frua tempo la Esperanto-Movado ĝenerale, precipe UEA, baraktis pro manko de financaj rimedoj. Eĉ se per la membrokotizoj povas esti kovrataj la rutinaj administraj laboroj, la eldonado de la revuo kaj *Jarlibro*, por ĉiu ajn aparta iniciato aŭ speciala kampanjo necesis havigi subtenon apelaciante al la donacemo de la membraro kaj, preskaŭ ĉiam, starigante apartan fondaĵon. Ofte oni serĉis la vojon por havigi monrimedojn el aliaj fontoj, sur pli komerca bazo, sed la klopodoj restis sen la dezirata rezulto.

Dum sia 13-jara direktoreco de la Centra Oficejo Marianne H. Vermaas konfrontiĝis kun tiu situacio kaj fine venis al ideo fondi kapitalon, el kies interezo la Movado povos esti subvenciata. En 1968, la jaro de la 60-a datreveno de la fondo de Universala Esperanto-Asocio fare de Hector Hodler — kies heredita kapitalo jam delonge praktike malaperis — ŝi proponis fondon de nova Kapitalo-Hodler.

La propono baziĝis sur jenaj principoj. Al aparte starigota institucio oni pruntos (a) sumojn de 1000 ned.gld. por tempodaŭro de 10 jaroj je interezo de 2%; (b) oni pruntos samajn sumojn por tempodaŭro de 6 jaroj senintereze; (c) oni povas donaci sumojn je kiu ajn alteco. Ĉiujn sumojn la estraro de la institucio — nomota de la Estraro de UEA — investos kiel eble plej favore. Pri subvencioj el interezoj ĉiujare decidos la estraro. Administranto prizorgos la librotenadon,

kiun regule kontrolos profesia revizoro, kaj plenumos la ĉiutagan administradon.

Dum la UK en Madrido (1968) unue la Estraro kaj poste la Komitato de UEA unuanime akceptis la proponon. Post pretigo de la Statuto, la 28-an de oktobro 1968 Institucio Hodler 68 estis fondita per notaria akto. Samtempe ĝi estis tuj registrita kiel jura persono laŭ la nederlanda leĝo de la 31-a de aŭgusto 1956.

La Instituto estas memstara jura persono, sed tamen ligita al UEA, ĉar ĝian Estraron nomas la Estraro de UEA. Laŭ la Statuto, la celo de la Institucio estas la mastrumado de Kapitalo-Hodler 68, precize laŭ la prezentitaj principoj.

20.5.2 Rezultoj

Intertempe, la publikigo de la iniciato havis eĥon inter la membraro de UEA kaj en mallonga tempo estis ricevita granda nombro da pruntoj kaj donacoj. De tiam la kapitalo regule kreskas.

En la momento de la fondiĝo la Estraro de Institucio Hodler 68 konsistis el E. L. M. Wensing, prezidanto, E. J. Woessink kaj M. Jaumotte. Kiel administranto estis nomita Marianne H. Vermaas, la iniciatinto kaj animo de la Institucio. Fine de 1972 la konsisto estas jena: G. Maertens (Belgio), prezidanto, D-ro W. Bormann (F.R. Germanio) kaj E. Haverschmidt (Nederlando). Marianne Vermaas plu funkcias kiel administranto.

Fine de 1972 la kapitalo konsistis el 38.500 gld. de pruntoj (a), 50.000 gld. de pruntoj (b), 55.000 gld. de donacoj, entute 143.500 gld.

Je same rondaj sumoj la kapitalo estas jene investita: loĝdomo en Rotterdam 35.000 gld., akcioj de investkompanio „ROBECO" 20.000 gld., obligacioj Amsterdam-Rotterdam je interezo de 8% 20.000 gld., akcioj „Royal Dutch" 20.000 gld., hipoteko je interezo de 8½% 40.000 gld., entute 135.000 gld. La cetero estas likvida mono.

La unuan fojon Institucio Hodler 68 distribuis la gajnon en 1970 laŭ jena divido: 2.400 gld. al Fondaĵo Canuto por membrigi al UEA 80 Membrojn-Abonantojn en landoj kun transpagaj malfacilaĵoj; 1.000 gld. al Akademio de Esperanto; 2.500 gld. al la Centra Oficejo de UEA por eksterordinaraj laboroj de la oficistaro; 750 gld. por la Fondaĵo-LMLP por helpi la pluan eldonadon de la revuo *La Monda Lingvo-Problemo*. En 1972 la profito de 1971 estis jene dividita: 1.400 gld. al Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo por stipendioj al 3 studentoj; 1.200 gld. al eldonejo Stafeto por specialaj ilustraĵoj kaj bindado de la eldonota verko *La Luzidoj* (gravega por la Esperanta kulturo) en la Serio Oriento-Okcidento de UEA; 1.000 gld. al Akademio de Esperanto; 2.400 gld. por 96 elektitaj novaj abonoj al

la revuo *La Monda Lingvo-Problemo;* 1.500 gld. al Fondaĵo Canuto por 50 membroj en la kategorio MA.

Pliaj pruntoj kaj donacoj estas daŭre akceptataj. Ju pli multnombraj la kontribuoj, des pli granda kaj varia la subvenciado. Ĉiu disponigita sumo tuj komencas produkti interezon. La partoprenantoj en la kapitalo fakte rezignas parte aŭ tute nur pri la interezo, kiun ili ricevus per alimaniera investado de la sama sumo, kaj tio estas relative tre malgranda ofero kompare kun la tre granda efiko.

20.6 INSTITUTO POR ESPERANTO EN KOMERCO KAJ INDUSTRIO (EKI)

20.6.1 Fondiĝo kaj Celoj

Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI) estis fondita, en formo de fondaĵo, per notaria akto, la 10-an de oktobro 1963, en Nederlando. Ĝiaj fondintoj, kiuj kune formis kaj plu formas la Estraron, estas E. L. M. Wensing (Nederlando), E. Carlén (Svedio), B. Vogelmann (F.R. Germanio).

La celo de EKI estas disvastigi kaj propagandi, per ĉiaj leĝkonformaj rimedoj, la uzon de la Internacia Lingvo (Esperanto) en internaciaj ekonomiaj rilatoj.

Laŭ Art. 3 de la Statuto EKI klopodas atingi sian celon jene: disvastigi la scion kaj konon pri la praktika uzebleco de Esperanto en komercaj, industriaj, ekonomiaj kaj turismaj medioj, kaj certigi al si la kunlaboron de la internacia komerca mondo; daŭre atentigadi pri la lingva problemo kaj pri la urĝa neceso solvi ĝin en internaciaj ekonomiaj rilatoj; stimuli la enkondukon de Esperanto en la internacian komercan korespondadon; instigi entreprenojn kaj instituciojn uzi la Internacian Lingvon por internacia reklamado kaj propagando; kolekti adresojn de ĉiuj entreprenoj, institucioj kaj publikaj servoj, kiuj povas korespondi en Esperanto, kaj regule eldonadi aŭ eldonigi la kolektitan adresmaterialon; instigi entreprenojn, laborantajn por la internacia merkato, ke ili uzu Esperanton sur siaj broŝuroj kaj varbmaterialo; organizi internacian tradukservon kaj disponigi ĝin al ĉiuj, kiuj deziras anonci, publikigi aŭ propagandi en Esperanto; instigi fakajn specialistojn sur la kampo de komerco kaj industrio kunlabori en la kompilado de specifaj fakvortaroj, eventuale prizorgi la eldonon de tiaj vortaroj; stimuli la okazigon de Esperanto-kursoj por komerco kaj industrio, kaj aktivigi la studadon de komerca Esperanto.

20.6.2 Organiza Strukturo

EKI estas sendependa institucio kun jura personeco, sed multrilate ligita al UEA, kiel vidiĝas el la subaj organizaj principoj.

La Estraro de EKI konsistas el tri aŭ kvin membroj. En kazo de tri membroj, du el ili estas nomataj de la Estraro de UEA, la trian elektas la du jam nomitaj estraranoj. En kazo de kvin membroj, tri el ili estas nomataj de la Estraro de UEA, la du aliajn elektas la tri nomitaj estraranoj. La Estraro dividas inter si la funkciojn de prezidanto, vicprezidanto, sekretario-kasisto.

La Estraro de EKI, interkonsente kun la Estraro de UEA, nomas la Patronan Komitaton (PK). La membroj de la PK povas esti fizikaj aŭ juraj personoj, kies financaj subtenoj aŭ apogoj al la celoj de EKI estas tiaj, ke la Instituto rajtas atendi de ilia patroneco pozitivan kontribuon. Laŭ Art. 8 de la Statuto, la Estraro de EKI regule informas la PK pri la agado de la Instituto. Se unu aŭ pluraj membroj de la PK malaprobas la laboron aŭ la politikon de la Estraro, ili havas la rajton plendi al la Estraro de UEA kaj peti ĝin kunvoki la PK kaj la Estraron de la Instituto.

La administran laboron, laŭ Art. 9 de la Statuto, faras la direktoro de EKI. Li estas nomata de la Estraro de la Instituto, sed la proponon devas sankcii minimume la prezidanto, ĝenerala sekretario kaj du aliaj membroj de la Estraro de UEA.

Art. 11 preskribas, ke la administra jaro estas la kalendara jaro kaj ke, plej malfrue tri monatojn post la finiĝo de la administra jaro, la Estraro de EKI devas detale raporti al la Estraro de UEA.

La Instituto havigas la necesajn financajn rimedojn por realigi la celojn per jenaj enspezoj: subvencioj de la membroj de la PK, libervolaj kontribuoj de fizikaj kaj juraj personoj, abonoj kaj anoncoj, eventuale aliaj libervolaj kontribuoj.

En kazo de malkonsento, rezultanta de la realigado aŭ interpretado de la reguloj kaj kondiĉoj antaŭviditaj en la Statuto, la demando devas esti submetita al arbitracia tribunalo, kiu konsistas el la ĝenerala sekretario de UEA kaj du membroj de la Estraro, nomitaj de li.

La sidejo estas en Rotterdam. La nuna adreso estas tiu de la prezidanto E. L. M. Wensing, Postbus 72, Valkenswaard NB, Nederlando.

20.6.3 Agadoj

Tuj post la fondiĝo EKI pretigis grandan kvanton da cirkuleroj, en kiuj estis klarigitaj la celoj kaj taskoj de la Instituto. Ili estis presitaj en la lingvoj Esperanta, franca, germana, angla, hispana,

itala, sveda kaj nederlanda. La cirkuleroj estis vaste distribuitaj en medioj de komerco kaj industrio. Kvankam la rezulto de tiu varba agado ne estis tre kontentiga — nur malmultaj ricevintoj pretis finance subteni la celojn kaj taskojn — EKI tamen atentigis pri la Internacia Lingvo multajn komercajn kaj industriajn entreprenojn. Pluraj nacilingvaj revuoj kaj gazetoj menciis la starigon de EKI; aperis ankaŭ informoj en la radio.

La plej grava agado de EKI estis la poliglota komerca-ekonomia vortaro, iniciatita en oktobro 1964. Ĝin redaktis F. Munniksma (Nederlando) kaj kunlaboris 24 personoj el Britio, Ĉeĥoslovakio, F.R. Germanio, Hispanio, Italio, Japanio, Jugoslavio, Nederlando, Portugalio, Svedio, Svislando, Soveta Unio kaj Usono. Profesoroj I. Lapenna kaj G. Waringhien ricevis la dokumentojn porinforme.

La vortaro estas naŭlingva kaj konsistas el angla, Esperanta, germana, hispana, franca, itala, nederlanda, portugala kaj sveda sekcioj. Proksimume 2.000 plejparte specifaj fakterminoj kaj nocioj estas difinitaj en la angla kaj en Esperanto. Ĉiun vortgrupon komencas la angla termino, sekvata de difino en la angla. Post ĝi troviĝas la Esperanta termino kun difino en Esperanto, kaj tiam sekvas la terminoj en la sep aliaj naciaj lingvoj. Por ĉiuj lingvoj, escepte de la angla, estas indeksoj kun la numeroj de la vortgrupoj. La anglaj terminoj troviĝas alfabete en la verko. La lasta parto de la libro entenas la nomojn de ĉ. 180 landoj, insulogrupoj ktp., kun valutoj, pli ol 600 urbonomojn kaj nomojn de produktoj de la mondmerkato. (Postredakta noto: La vortaro fine aperis en la komenco de 1974.)

Menciindaj estas kelkaj aliaj rezultoj. La mondkonata Philips eldonis riĉe ilustritan katalogon en Esperanto kun priskribo de ĝia kompleta programo de X-radiaj kaj elektromedicinaj aparatoj. La tradukon el la originala angla versio prizorgis la prezidanto de EKI. La konata firmo Gevaert (nun Agfa-Gevaert) sinkronigis Esperantlingve unu el siaj industrifilmoj; ĝi ankaŭ esperantigis la uzoinstrukciojn por siaj produktoj. Gevaert estis unu el la plej gravaj subvenciantoj de EKI. Ytong-fabrikoj en Svedio publikigis atente prizorgitan kolorprospekton en Esperanto kaj distribuis ĝin tra la tuta mondo. Ankaŭ ĝi grave subtenis EKI.

Estas ne nur dezirinde, sed necesege, ke EKI kiel eble plej grandskale diskonigu sian programon, siajn celojn kaj taskojn. La mondaj komerco kaj industrio ja sentas tre peze la lingvan problemon. La vastigo de la uzo de Esperanto en tiuj medioj ne nur helpus al internaciaj ekonomiaj rilatoj, sed ankaŭ multe influus la disvastigon de la lingvo en aliaj sferoj.

20.6.4 Grava Postredakta Noto

La prezento de la organiza strukturo en 20.6.2 baziĝas sur la Statuto de EKI, kiun unu el la fondintoj, E. L. M. Wensing, prezentis al la Estraro de UEA en 1963 kaj kiun la Estraro aprobis en la printempa kunsido de tiu jaro. Neniam estis menciita kia ajn alia Statuto, kaj ĉiu devis kredi, ke la Statuto leĝigita per la notaria akto de la 10-a de oktobro 1963 estas tiu, kiun aprobis la Estraro de UEA, kaj laŭ kiu EKI devis esti rigardata kiel institucio de UEA.

Nur post la eksiĝo de E. L. M. Wensing el la Estraro de UEA, en decembro 1972, montriĝis, ke la proponinto esence ŝanĝis la Statuton aprobitan de la Estraro kaj leĝigis la 10-an de oktobro 1963 tiun ŝanĝitan Statuton, pri kiu nek la Komitato nek la Estraro de UEA sciis kion ajn. Tiun ŝanĝitan kaj notarie leĝigitan Statuton la verkinto de tiu ĉi sekcio ricevis nur la 19-an de januaro 1973, post kiam tiu ĉi ĉapitro estis finredaktita.

La nomo kaj celoj en la du Statutoj estas la samaj, sed rilate organizan strukturon gravaj ŝanĝoj estis faritaj en la nova teksto, neniam aprobita de la Estraro aŭ de kiu ajn alia instanco de UEA. Por komparo kun la organiza strukturo priskribita supre en 20.6.2, jen la ĉefaj novaj reguloj:

Estas ellasita la regulo, ke du, resp. tri, membroj de la Estraro de EKI estas nomataj de la Estraro de UEA. Art. 4 nur konstatas, ke kiel unuaj estraranoj funkcias E. Carlén, B. Vogelmann kaj E. L. M. Wensing. La estraranoj dividas inter si la funkciojn de prezidanto, vicprezidanto kaj sekretario (Art. 5). La estraraneco finiĝas 6 jarojn post la dato de la nomigo, sed la eksiĝintaj estraranoj estas tuj reelekteblaj; escepte, la estraraneco de B. Vogelmann devis finiĝi en 1964, tiu de E. Carlén fine de 1965, kaj tiu de E. L. M. Wensing fine de 1966; la restantaj estraranoj elektas novajn estraranojn por plenigi la vakajn lokojn; la Estraro mem decidas, ĉu la nombro de estraranoj estos altigita al 5 kaj, se jes, mem nomas la pliajn estraranojn (Art. 6). Kvankam la mandato de ĉiuj estraranoj de EKI en ĉiu okazo finiĝis en 1969 ankaŭ laŭ tiu ĉi Statuto, novaj elektoj neniam okazis, kiel vidiĝis ankaŭ el la eksiĝa letero de E. L. M. Wensing de la 23-a de decembro 1972 el la Estraro de UEA.

Plue, la Estraro de EKI, sen kia ajn interkonsento kun la Estraro de UEA, nomas la Patronan Komitaton (PK). La membreco en la PK ne estas tempe limigita, sed la Estraro de EKI „rajtas ĉesigi ĝin ĉiumomente" (Art. 7). La membroj de la PK ne rajtas plendi al la Estraro de UEA pro la laboro aŭ politiko de EKI, sed ili povas nur turni sin al la Estraro de EKI kun la peto, ke ĝi kunvoku komunan kunsidon de la PK kaj de la Estraro de EKI (Art. 8). La Statuto ne preskribas, ke la Estraro de EKI devas kunvoki tian kunsidon. Cetere,

ne estas konate ĉu entute ekzistas la PK.

La direktoro de EKI estas nomata de la Estraro de EKI (Art. 9) sen kia ajn aprobo de la Estraro de UEA aŭ de ĝiaj funkciuloj. Efektive, la direktoro ankoraŭ ne estas nomita.

Plej malfrue tri monatojn post la fino de la administra jaro, la Estraro de EKI devus detale raporti al la PK, submetante al ĝi ankaŭ financan raporton kontrolitan de profesia revizoro (Art.11); ĝi, do, ne plu devas raporti al la Estraro de UEA, kiel estis preskribite en la originala Statuto. Ankaŭ CED neniam ricevis tiajn raportojn, se entute ili estis publikigitaj.

La regulo pri arbitracio estis ŝanĝita. Laŭ Art. 14, la tribunalo devus konsisti el tri membroj de la PK, elektataj de tiuj membroj de la Estraro de UEA, kiuj ne estas estraranoj aŭ direktoro de EKI. Ĉar la Estraro de UEA neniam ricevis la liston de la membroj de la PK kaj, kiel dirite, la PK fakte ne ekzistas, ankaŭ tiu tre malforta ligo kun UEA perdas sian valoron.

Kiel vidiĝas, laŭ tiu ĉi Statuto EKI ne estas institucio de UEA. Se ĝi ne aktiviĝos en la baldaŭa estonteco, UEA devos entrepreni aliajn paŝojn por disvastigi la lingvon en medioj de industrio kaj komerco, kaj por krei adekvatajn servojn en tiu grava sfero.

20.7 KULTURA ASOCIO DE LA KASTELO GRÉSILLON

20.7.1 Fondiĝo kaj Celoj

La historia aspekto de ĉi tiu institucio montras, kiel grandefika povas esti la persisteco de unu homo: la kultura domo estas ja kreaĵo de Henri Micard.

Jam inter 1934 kaj 1939 li ĉiujare organizis kun s-ro Bourguignon „someran lernejon" destinitan por instrui la lingvon al siaj gekolegoj instruistoj; el tio rezultis la estiĝo de „Grupo de Esperantistaj Edukistoj". Sed post la milito estis tre malfacile lupreni lokon taŭgan por tiaj someraj aranĝoj. Kaj en 1951 H. Micard proponis, ke estu aĉetita tiucele iu domo. Per cirkulero aprobita de la estraro de GEE, kies ĝenerala sekretario li estis, li sugestis, ke sufiĉus trovi 600 personojn, kiuj konsentus pruntedoni po 10.000 de la tiamaj frankoj (100,00 novaj frankoj).

Venis respondoj tiel kuraĝigaj, ke la 16-an de septembro 1951 la iniciato de H. Micard povis konkretiĝi per la fondo de „La Kulturdomo de la Franclandaj Esperantistoj", kies administra konsilio konsistis precipe el estraranoj de GEE. Sed en la kaso sumiĝis nur iom pli ol unu miliono, dum necesis por ia aĉeto almenaŭ la sesoblo. La prezidanto de la nova asocio sendis novan cirkuleron por anonci, ke li vizitos la 18-an de oktobro du kastelojn ĉirkaŭ Baugé.

La 19-an de oktobro per nova cirkulero H. Micard informis, ke li efektive vizitis la kastelon Grésillon: „... agrabla regiono, beleta kastelo, sed sen elektro kaj sen akvo en la ĉambroj; krome necesas kolekti almenaŭ unu plian milionon..." Per pluraj vojaĝoj li klopodis akiri pli favorajn kondiĉojn; kaj la 4-an de novembro interkonsento estis jam farita, dum mankis ankoraŭ 1,500.000 fr.

Unu fojon pli H. Micard strebis por solvi la problemon: li trovis lignovendiston, kiu aĉetis mem la tuton kaj konsentis revendi ok hektarojn kun la konstruaĵoj al la asocio, kondiĉe ke li rajtu dehaki la arbojn sur la tuta bieno. Sekvis pluraj diskutoj por precizigi ĉi tiun punkton. Krome, se du milionoj estis tuj pagitaj, restis ankoraŭ unu kolektota ĝis la fino de decembro; plie estis pagotaj la impostoj kaj aĉetokostoj (750.000 fr.): nova alvoko estis tiucele farita.

Fine la asocio posedis belan kastelon, sed tiu ĉi estis same malplena kiel la kaso. Necesis instali akvon kaj elektron, aĉeti litojn, tukojn, kovrilojn, tablojn, manĝilaron, kuiran materialon, ĉion. Dum la paskaj ferioj pluraj membroj venis por provizi la plej urĝajn bezonojn: akvon kaj elektron. En aŭgusto 1952 la unuaj vizitantoj de la inaŭguro devis kunporti siajn littukojn kaj dormi en pruntedonitaj litoj. Nur en 1953 loterio ebligis la aĉeton de la unuaj mebloj.

Tiel do dank'al la iniciato kaj eĉ pli, al la persistemo de H. Micard estis fondita „La Kulturdomo de la Franclandaj Esperantistoj", kies celo estas aĉeti bienon kun la bezonata materialo kaj administri ĝin tiel, ke estu aranĝeblaj periodoj de kunvenoj instruaj, kulturaj kaj distraj en la Lingvo Internacia. Certe, en la komenco mankis ĉia komforto, kaj kiuj ne komprenis la grandan perspektivon de la projekto, tiuj neniam revenis. Sed baldaŭ, kiam ges-roj H. Micard, loĝantaj ne malproksime de la kastelo, povis emerite dediĉi sian tutan tempon al la prospero de la afero, ili iom post iom sukcesis estigi senegalan hejmon de Esperanta kulturo, realigante la proverbon: „Al pec' pecon algluas, kiu neston konstruas."

20.7.2 Organiza Strukturo

La tuto estas administrata de asocio, kies jura karaktero, sub la titolo „La Kulturdomo de la Franclandaj Esperantistoj", estas kooperativa societo kun variigeblaj socia kapitalo kaj personaro (laŭ la francaj leĝoj de la 27.7.1887 kaj 7.5.1917). Ĉiu societa parto nominale valoras 100,00 frankojn kaj sufiĉas aĉeti unu por esti plenrajta membro. Cetere ĉiu havas nur unu voĉon, kiom ajn li akiris da societaj partoj.

Ĝenerala jarkunveno nomas la 15 membrojn de la administra konsilio, kiu — kune kun teknika komitato da gehelpantoj sen limigita nombro — certigas la funkciadon de la domo; aliflanke estas

elektitaj ankaŭ du membroj komisiitaj revizii ĉiujare la kontojn.

La unua administra konsilio konsistis el: Henri Philippe, honora prezidanto; Henri Micard, prezidanto; Marcel Volquemar, vicprezidanto; Edmond Bidoit, sekretario; Maurice Coussé, kasisto; s-ino Trésorier, helpkasistino; M. Bodereau, R. Bressont, J. Dedieu, Frédéric H. Genuit, J. Guillaume, Thébaud, membroj.

La ĉefaj gvidantoj en 1973 estas: P. Babin, prezidanto, B. Cheverry vicprezidantino, J. P. Guillot, sekretario kaj P. Chevalier, kasisto.

20.7.3 Ĉefaj Rezultoj

Ĉiun jaron kutime okazas du semajnaj periodoj dum la paskaj lernejaj ferioj; kaj en la somero kvar periodoj: unu trisemajna en julio, alia dusemajna internacia dum la kongresa tempo, unu trisemajna en aŭgusto kaj la fina dusemajna en septembro. La plimulto el ili konsistas el plurgradaj kursoj en la mateno, diversaj kulturaj aktivadoj (bindado, emajlado, korbofarado), prelegoj, debatoj kaj konversacioj en la posttagmezo, kaj distraĵoj en la vespero (filmoj, teatraĵoj, ludoj). Fine, en ĉiu periodo okazas ekskursoj tra la regiono fama pro siaj historiaj spuroj kaj kasteloj (Luaro kaj Anĵuo); ĉiun periodon partoprenas inter 60 kaj 120 personoj.

En la unuaj jaroj la aranĝoj celis precipe la materialan instaladon de la kastelo (interalie la ĉambran komforton, ludlokojn, banejon apud la lageto); ĉiujare kreskis kaj moderniĝis la komforto. El la plej gravaj datoj elstaras 1957, kiam okazis antaŭkongreso de la UK en Marsejlo; 1962, kiam por la 10-a datreveno la kastelo organizis la francan kongreson kaj la 1-an Kulturan Semajnon por gejunuloj (jam de la 11-a jaro tiuj ĉi ĝin prizorgas mem); kaj 1968, kiam UEA starigis specialan kulturan seminarion survoje al la UK en Madrido. Aparte en 1972 por sia 20-a datreveno la Kulturdomo organizis simpozion, al kiu estis invititaj 30 el la plej gravaj Esperanto-asocioj. Pluraj sendis oficialajn reprezentantojn; ili povis en la tre agrabla etoso de tiel oportuna forumo prezenti siajn asociojn, interŝanĝi opiniojn kaj fruktodonajn ideojn.

Dume la dumonata kaj kultura revuo *Kulturaj Kajeroj* informas pri la kastela vivo; korespondaj kursoj kaj libroservo funkcias dum la tuta jaro. En la apuda urbeto Baugé estiĝis nova Esperanto-grupo, kiu prosperas kaj favore influas la regionajn loĝantojn; eĉ strato Zamenhof estis inaŭgurita en 1962, ĝuste tiu, kiu aliras la kastelon.

20.8. ESENCA BIBLIOGRAFIO

Hube, Walter, „40-jara jubileo de Internacia Esperanto-Muzeo". *Informilo de IEMW*, vol. 18, 1967, n-ro 3 (67), p. 1-4.

ISU: Elektitaj prelegoj 1949-1954. Purmerend 1955.
Somera Universitato Malmö 1948. Rickmansworth 1949.
Dokumentoj kaj periodaĵoj:
Aktoj de la Akademio 1963-1967. Rotterdam 1967.
Dokumentoj de CED, 1952-1972.
Internacia Somera Universitato, CED-Dok. G/II/1-20.
Raportoj de CED, en *Jarlibro* de UEA, 1952-1973.
Raportoj de la Estraro de UEA, 1964-1972, precipe la partoj pri Institucio Hodler 68 kaj EKI.
Regularo pri ISU.
Rubrikoj de CED, en *Esperanto*, 1952-1973.
Statutoj de Institucio Hodler 68 kaj EKI.

KVINA PARTO

ATAKOJ KAJ APOGOJ

ĈAPITRO 21

PERSEKUTOJ KONTRAŬ LA INTERNACIA LINGVO*

21.1 ENKONDUKO

Dum la unuaj jaroj de ĝia ekzistado, la adeptoj de Esperanto klopodis enpenetri la socion sub ne tre favoraj cirkonstancoj. La ideo de Internacia Lingvo, kiun verŝajne plimulto principe apogis, estis tro kompromitita per la sensacia disvastiĝo kaj abrupta pereo de Volapük por povi atendi entuziasman aklamon, kiam D-ro Zamenhof submetis unu el multaj projektoj, kiuj aperis ĉiujare kaj kutime ne transpaŝis la stadion de unusola broŝuro. Seniluziiĝo en la publiko, skeptiko inter sciencistoj, indiferenteco aŭ mokoj ĉe la establita lingvistiko estis la ĉefaj malamikoj de la optimismaj disĉiploj de Zamenhof. Tiun ĉi grandparte pasivan sintenon kontraŭ Esperanto akompanis opozicio nur tiam, kiam la lingvo efektive eniris pli vastajn tavolojn, fariĝante socia fenomeno kaj ofte kunligiĝante kun emancipaj fluoj, kiuj koliziis kun fortaj interesgrupoj en la socio.

Ĉar la esperantistoj esperis, ke registaroj subtenos kaj poste oficialigos la lingvon, la plimulto el ili zorge evitis ĉiujn paŝojn, kiuj povus ĝin suspektigi en la okuloj de la aŭtoritatoj. Sed tia taktiko entenis kontraŭdiron en si mem; eĉ plej emfazaj diroj, ke Esperanto estas nur lingvo, ne sukcesis forviŝi la dekomencan asociiĝon kun la idealo de interpopola kompreniĝo, kiun Esperanto volis akceli, spi-

* Por detalaj fontindikoj oni bonvole konsultu la pli fruan version de tiu ĉi ĉapitro, kiu aperis broŝurforme sub la titolo *La danĝera lingvo* (Kioto 1973).

tante la kontrolon kaj ofte eĉ volon de konservativaj kaj naciismaj reĝimoj.

La unuan lecionon pri ŝtata potenco la esperantistoj lernis jam en 1895, kiam la cara cenzuro pro la aperigo de du artikoloj de Tolstoj en *La Esperantisto* malpermesis la eniron de tiu revuo en Ruslandon. Sekve de tiu grava bato kontraŭ la juna Movado perdiĝis la influo de la rusaj idealistoj, kaj dum pli ol dek jaroj dominis la Francoj sub De Beaufront, kiu klopodis rigore sekvi pure porlingvan strategion.

Same kiel en tiu rusa incidento, kie Esperanto ludis nur akcesoran rolon, ankaŭ en postaj kazoj de persekuto, la atakoj de iu reĝimo direktiĝis malpli kontraŭ la lingvo ol kontraŭ politika agado pere de ĝi resp. kontraŭ ĝia supozata revolucia enhavo. Sed la limoj inter persekuto kontraŭ Esperanto kaj kontraŭ difinita apliko kutime restas neklare fikseblaj, ĉar, kiel la pozicio de registaro aŭ politika movado al Esperanto liveras ne malofte perfektan indikilon pri la grado de demokrateco, kiun havas tia institucio, tiel ankaŭ la politika konvinko, kiu submetis esperantiston al persekuto, ĝenerale fontis en Esperanto aŭ kombiniĝis kun ĝi kaj estis la plej konsekvenca realigo de la Esperanta idealismo: La nazioj persekutis centojn da marksistaj esperantistoj — unuavice pro ilia kontraŭfaŝisma aktiveco, sed la aldona scio de Esperanto plisuspektigis ilin kiel danĝerajn malamikojn de la ŝtato, ĉar pere de tiu lingvo ili ŝajnis disponi privilegian pozicion por internacia „konspirado".

Se multaj esperantistoj, celante konservi la bonvolon de nedemokrataj reĝimoj, distancigis sin de politika „misuzo" de Esperanto, ili per tio ignoris sian propran tradicion kaj proksimiĝis al perfido de siaj proklamitaj idealoj: servi al internacia kompreniĝo, al faciligo de interhomaj rilatoj kaj al tutmonda paco. Kontraŭe, la naziismo, komprenante la paradokson de utiligo de Esperanto por pure naciecaj celoj, nete rifuzis distingi inter la porlingva propagando kaj la „juda origino" (aŭ kiel ajn ili parafrazis la idean fonon de la Internacia Lingvo).

21.2 UNUAJ KONTRAŬAGOJ

La efiko de ŝovinisme motivitaj atakoj kontraŭ Esperanto (en 1905 germana gazeto nomis ĝin „internacia anarkista lingvo") sentiĝis jam komence de tiu ĉi jarcento, lige kun la diskutoj pri la organiza formo de la Esperanto-Movado. Unu partio argumentis i.a., „ke la internacia federacio timigos la registarojn, kiuj vidos en ni danĝeran korporacion kaj agos kontraŭ ni". Tian vidpunkton Kazimierz Bein

(Kabe) citis refutcele dum la Bulonja Kongreso; laŭ lia opinio, registaroj kapablas distingi inter la koloroj verda kaj ruĝa. Efektive, post kiam en 1911 la prezidanto de Ruslanda Ligo Esperantista, A. Postnikov, estis arestita pro spiona agado, sekve de kio pluraj Esperanto-grupoj estis fermitaj, informiĝo de Edmond Privat en Peterburgo rezultigis oficialan deklaron de la Ministerio pri Internaj Aferoj, ke oni ne konkludas surbaze de tiu incidento pri danĝeraj celadoj de Esperanto.

Tamen, ĝuste en Ruslando okazis, antaŭ la Unua Mondmilito, la plej multaj incidentoj. Post kiam longe ne eblis eldoni gazetojn kaj librojn en Esperanto, ĉar la ŝtata aparato ne sufiĉe rapide edukis lingvokapablajn cenzuristojn, ankaŭ en la jaroj inter 1905 kaj 1914 la aŭtoritatuloj plurfoje ĉikanis simpatiantojn de la Internacia Lingvo. Unu Esperanto-kurso en Popola Domo devis esti ĉesigita, kiam la posedanta grafino eksciis pri la instruado de tiu lingvo de „diablaj framasonoj"; en 1911, rusa policestro ordonis, ke oni detruu afiŝojn en Esperanto, ĉar „la loĝantoj ne komprenas ilin", kaj la delegito de UEA en Kronstadt estis arestita pro propagando de la lingvo; komence de 1913, moskvaj esperantistoj dum preskaŭ tuta jaro, sensukcese, petadis permeson por organizi kongreson; al kunveno en Vladivostoko polica oficiro malpermesis paroli publike pri Esperanto; en 1912, eĉ rusa diplomato en Parizo estis komisiita kolekti informojn pri tie rezidanta organizaĵo, la SAT-antaŭulo „Liberiga Stelo", laŭ kies programo ŝajne tiel multaj Rusoj entuziasmiĝis por Esperanto.

Ankaŭ en la hungara urbo Székesfehérvár polic-kapitano malpermesis al laboristoj lerni „tiun ŝtelistan lingvon" — pri kio poste oni diskutis en la parlamento. Kaj fine de 1911, la gvidanto de grupo en Mukden (Ĉinio), kulpigita „revoluciano, ĉar li adoras Tolstoj kaj Esperanton", nur per fuĝo povis elsaviĝi. Alia ĉina societestro estis mortigita de nekonato, post publika deklaro de la urbestro: „Esperanto eble kaŭzos revolucion!"

Sed la impreso, kiu povus altrudi sin pro tiuj ekzemploj, nome ke jam tiutempe Esperanto nerevokeble ligis sin aŭ estis asociata kun „maldekstrismo", nepre bezonus ĝustigon. Kontraŭ simpliga prezento, ke estis klara divido-linio inter progresemaj esperantistoj, unuflanke, kaj reakciaj kontraŭuloj, aliflanke, parolas precipe du faktoj. Unue, la lingvon lernis, unuavice, homoj nepolitikemaj, kaj la Movado en tiu tempo estis fakte kontrolata de homoj, kiujn konscia socialisto kalkulus al la „klas-malamikoj". Due, la establitaj laboristaj asocioj kaj partioj ignoris, hezite subtenis aŭ eĉ malfavoris la adeptojn de Esperanto. Tiel, ekz., la gvidantoj de la Socialdemokrata Partio de Germanio malpermesis al la partia gazetaro, speciale al sia centra

organo, publikigi kion ajn pri Esperanto, kaj la nederlanda socialisto W. van Ravensteyn nomis la propagandon de la lingvo inter laboristoj „danĝera ludeto" kaj la Esperanto-Movadon „burĝa malsaĝaĵo".

Pli klarvida estis Jean Jaurès, laŭ kiu Esperanto estas „la latino de la demokratio", sed se la polico kaj aliaj institucioj, flarante danĝeron eliranta de „artefarita" lingvo, obstrukcis la disvastigon de Esperanto, kredeble iliaj viktimoj estis pro tio plej multe surprizitaj, ne povante kompreni, kial okupiĝo pri tia laŭmoda afero alprenas tian karakteron preskaŭ ŝtatrenversan. Restas esplorota tereno, ĝis kia grado tiuj frutempaj, subjektive kiel objektive apenaŭ pravigeblaj, persekutoj kontribuis al la posta venkiro de Esperanto. Ial tiu lingvo ne restis afero neglektebla, kiel Volapük kaj multaj aliaj projektoj, sed — aŭ entuziasmigis aŭ teruris homojn. Ĝi vekis, pli ol efemeran scivolon, la emociojn, ne ĉiam nur en la direkton al la amata Majstro, la „kara" lingvo aŭ „rondo familia", sed — apenaŭ du jardekojn post sia surmondiĝo — ankaŭ en tute kontraŭan direkton, kiel spertis ekz. la pioniroj en la ĉefurbo de la insulo Samos, komence de la jaro 1907.

Malklera vilaĝano, kiu estis (ŝerce?) persvadita de du advokatoj, ke Esperanto estas nur unu formo de framasonismo, kun sendube kontraŭreligia celo, sukcesis konvinki kelkajn konatojn en najbara vilaĝo, ke necesas puni la malpiajn esperantistojn. Tridek kamparanoj, armitaj per bastonegoj, forkegoj, kaprompiloj kaj hakiloj, marŝis en la kunvenejon de la Esperanto-societo kaj, trovinte neniun tie, disrompis la kadron de Zamenhof-portreto, dispecigis librojn kaj difektis ĉiujn meblojn. Kriante ili minacis mortigi la esperantistojn. Fine, cedante al la premo de l'plebo, la Princo ordonis dissolvi la societon, ĉar „la publika ordo estas malhelpita".

Se jam la modesta disvastiĝo de Esperanto antaŭ la milito sekvigis ĉikanadon flanke de unuopaj aŭtoritatuloj aŭ okazajn erupciojn de popola kolero, en la postmilita ekonomia kaj socia maltrankvilo, kun la antaŭenmarŝo de revoluciaj movadoj, Esperanto des pli altiris la suspekton de tiuj, kiuj timis internaciismon, aparte ties plej konkretan formon: la internacian solidarecon de la laboruloj, ĉar nun la lingvo ĉiam pli trovis lokon en la socio, nelaste dank' al la fondiĝo de SAT kaj la amaskursoj por laboristoj en tuta Eŭropo, kaj definitive ĉesis esti ignorebla ludaĵo.

„Venos tempo, kiam oni timos Esperanton, oni ĝin malamos pro la forte ligitaj kun ĝi ideoj de la frateco", diris la franca verkisto Henri Barbusse, kaj baldaŭ pruviĝis la vero de lia profetaĵo, ke la burĝaj esperantistoj mem ektimos la talismanan valoron, kiun Esperanto posedas en la manoj de laboristoj: La industriisto Albert Steche, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, alarmis en 1922 kontraŭ

„influoj malamikaj al popolo kaj ŝtato" en la Esperanto-Movado, alvokante la registarojn kaj komunumojn „zorgi pri tio, ke naciece pensantaj popolanoj trovu ĉie okazon senpage lerni Esperanton, por ke en socialdemokrataj kursoj ili ne estu edukitaj ne nur al esperantistoj, sed ankaŭ al socialdemokratoj. Ni estas devigitaj defendi la naciece kaj monarkiste pensantajn membrojn de nia popolo. Ĉiam pli urĝa iĝas la voko: Defendu nin, ni ne volas esti pelataj en la socialdemokratan tendaron!"

Tiaj avertoj estis akvo al la mueliloj de kontraŭsocialismaj registaroj, sed ili estis malproksimaj de ia emo plenumi la deziron mem servigi al si Esperanton. Sub influo de la onidira enkonduko de la lingvo en sovetajn lernejojn kaj de la sennaciiga celado de SAT, la franca edukministro Bérard entute malpermesis la instruadon de Esperanto (pro la implicitaj „danĝeroj")[1] kaj faris eĉ pli por malutili ankaŭ la ĝeneralan Esperanto-Movadon: Laŭ liaj instrukcioj, la franca delegito en Ligo de Nacioj, la filozofo Henri Bergson, kiu pli frue simpatiis al Esperanto, devis interveni, por ke la Komisiono por Intelekta Kooperado rifuzu studi la „demandon de artefarita lingvo". Antaŭ la sama forumo, brazila ministro akre atakis Esperanton kiel „lingvon de mizeruloj kaj komunistoj".

Hungaraj aŭtoritatoj disponis konkretan sperton pri la „danĝero" de esperantistoj, ĉar la lingvo estis preskaŭ oficialigita dum la Hungara Konsilantara Respubliko (1919). Dum la 21-a UK en Budapeŝto (1929) la polico malpermesis deklamadon de poemoj de Petöfi, kaj en 1934 Hungara Esperantista Societo Laborista estis dissolvita pro agado „kontraŭ sociklaso, religio kaj nacio". Dank' al adaptiĝo al la cirkonstancoj, la samjare reorganizita „neŭtrala" Movado sukcesis ĝui iom da subteno, sed ĝi neniam tiagrade malleviĝis kiel la germana asocio, rifuzante ekz. eksigi siajn judajn membrojn. Ĝenerale dum la 1920'aj jaroj, la Esperanto-Movadon ne trafis vastskalaj persekutoj, krom se temis pri apliko de la lingvo por socialismaj celoj. Fervore certigante sian lojalecon al la reĝimo, la neŭtralaj esperantistoj tiu-

1. Vidu la citaĵon en Ĉapitro 19.2.8 — La redakcio de *La Nova Epoko* (Moskvo) pro tio direktis malfermitan leteron al Bérard, en kiu ĝi esprimas sian „profundan dankon por la netaksebla servo, kiun vi faris al nia Esperanto-Movado". Ĉar: „Koncerne la francan junularon, kiun vi gardas kontraŭ ĉio malbona, ni opinias, ke se ĝis nun pro patriotisma kaj ŝovinisma spirito kulturata en la lernejoj la franca junularo malmulte inklinis lerni la internacilingvon, de nun ĝi lernos Esperanton kun aparta intereso kaj ardo, kiel malpermesaĵon, kiu ĉiam ŝajnas esti pli alloga kaj dolĉa." Fine, la letero konsilas al la ministro esti pli konsekvenca, „malpermesante la lernadon ne nur de Esperanto, sed precipe de la franca lingvo, en kiu bedaŭrinde dume aperis pli multe da revolucia literaturo".

okaze sukcesis sin ŝirmi kontraŭ malutilaj postefikoj.

21.3 „LINGVO DE JUDOJ KAJ KOMUNISTOJ"

21.3.1 Esperanto en la Tria Regno

Tiu stato ŝanĝiĝis en 1933, kiam Hitler transprenis la potencon en Germanio, kaj la ekzemplo de la germana faŝismo, kiu unua sisteme batalis kontraŭ la Esperanto-Movado, instigis plurajn aliajn reĝimojn pli atente observi la esperantistojn kaj, laŭbezone, persekuti ilin.

La radikoj de la persekutoj dum la Tria Regno troviĝas ĉe Hitler mem. En sia verko *Mein Kampf* (1925) li skribis:

> Tiel longe, kiel la Judo ne fariĝis la mastro super la aliaj popoloj, li vole-nevole devas paroli ilian lingvon, sed tuj kiam tiuj estus liaj servutuloj, ili ĉiuj devus lerni unu universalan lingvon (ekz. Esperanton!), tiel ke ankaŭ per ĉi tiu rimedo la Judaro povus regi ilin pli facile!

Jam en 1922, en parolado en Munkeno, li agitis samsence:

> La marksismo fariĝis la alpelanto de la laboristoj, la framasonismo servis kiel fermentilo por la „spiritaj" tavoloj, „Esperanto" estis faciligonta la „interkompreniĝon".

Fakte, Hitler nur redonis, en demagogia formo, vaste regantan opinion, resumante popularajn antaŭjuĝojn kontraŭ Esperanto inter konservativuloj kaj faŝistoj de tuta Eŭropo. Jam dum, kaj daŭre post la Unua Mondmilito, influaj organizaĵoj kaj personoj en Germanio ne preterlasis okazon por ataki Esperanton, ĉu ĉar ĝi estas konkurenco al hegemoniemo de la germana lingvo, subfosas la kulturan influon de Germanio eksterlande, servas kiel ponto por miloj da senutilaj fremdvortoj aŭ, kio fine montriĝis decida, estas ilo en la manoj de Judoj kaj komunistoj. Karl Vossler, profesoro pri latinidaj lingvoj, skribis en 1925, ke „en la gramatikon kaj vortaron de Esperanto penetris la internacia bolŝevismo kaj komunismo". Dekstra semajnrevuo faris plian paŝon, en 1926: „Tiu bastarda lingvo, sen radiko en la vivo de la popolo kaj sen ia literaturo estiĝinta el tiu vivo, estas efektive akironta tiun mondan pozicion, kiun atribuas al ĝi cionisma plano, kaj helponta ekstermi patriotismon en la estontaj laborsklavoj de Ciono!" Kaj komence de 1928 nazia deputito precizigis en la bavara parlamento: „Ne hazarde ekzistas simileco inter la verda stelo kiel simbolo de Esperanto kun la soveta insigno. Malantaŭ ĝi

staras la postuloj de l' internacia socialismo aŭ komunismo, kiuj iras direkte al malspirita niveligo de ĉiuj, al malvarm-racia politiko de utilismo, al ŝablonigo de la homaro, al kontraŭbatalo de ĉio spirite elstara, al sennaciigo."

Jam en marto 1933 estis disbatitaj Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA) kaj Socialista Esperanto-Asocio (SEA), per kio preskaŭ tri kvaronoj de la esperantistoj en Germanio perdis sian organizan bazon. Germana Esperanto-Asocio (GEA) klopodis transvivi per retiriĝo de sia internaciisma linio kaj ĉiam pli forta adaptiĝo al la postuloj de la reĝimo, fuĝante al tiaj argumentoj: ke Esperanto estas rimedo por garantii la purecon de la germana lingvo, ĉar ĝi englutas la fremdvortojn, kaj „por plifirmigi la germannacian konscion, pliprofundigi la konon kaj la komprenon de la germana lingvo, plifortigi kaj konservadi la germanecon eksterlande, komuniki al la eksterlandanoj komprenemon kaj estimon pri germana ecaro". En 1935 GEA elpelis eĉ siajn judajn membrojn kaj aldonis kiel celon: disvastigi la nacisocialisman mondkoncepton. Dume, ĝi devis batali kontraŭ akuzoj de la radikale naziema „Nova Germana Esperanto-Movado" (NDEB), kiu kontestis la sinceron de la „samdirektiĝo" de GEA, turnis sin kontraŭ la „senlima glorigo de D-ro Zamenhof", propagandis ne plu Esperanton, sed per ĝi faŝisman ideologion kaj eĉ fanfaronis pri siaj intimaj rilatoj kun Gestapo.

La etapoj de tiu morala descendo estis priskribitaj kaj abunde dokumentitaj jam antaŭ kelkaj jaroj. Intertempe, konsulto de la aktoj de la nazia Sekureca Polico, konservataj hodiaŭ en la Federacia Arkivo de Koblenz, permesas kompletigan kaj pli klaran bildon pri la taktiko, kiun la hitleranoj sekvis en sia kontraŭesperanta politiko, kaj ankaŭ pri iliaj reagoj je la klopodoj konstrui ian simbiozon inter Esperanto kaj faŝismo. La rezulto povas surprizi nur tiun, kiu havis aŭ havas iluziojn pri la naturo de la nazia barbareco.

La unuan gravan baton kontraŭ la restinta Movado donis dekreto de la edukministro Bernhard Rust, la 17-an de majo 1935:

> Flegado de artefaritaj mondhelplingvoj kiel la lingvo Esperanto ne havas lokon en nacisocialista ŝtato. Ilia uzado kondukas al malfortigo de esencaj valoroj de nacia ecaro. Sekve oni evitu ĉian akceladon de instruado pri tiaj lingvoj, porinstruaj klasoj ne estu disponigataj por tiu celo.

Nelonge post tio, la 26-an de junio 1935, Reinhard Heydrich, anstataŭanto de *Der Politische Polizeikommandeur der Länder* Heinrich Himmler, atentigis la Ministron pri Internaj Aferoj, ke „la Esperanto-Movado lastatempe disvolvas tre viglan aktivecon", menciante kiel ekzemplon, ke inter 36 personoj, arestitaj en marto 1935

21 PERSEKUTOJ KONTRAŬ LA INTERNACIA LINGVO

Tiu ĉi cirkulero (febr. 1936) de Martin Bormann malpermesis al nazianoj membrecon en Esperanto-organizajoj. Kvar monatojn poste, Himmler dekretis la dissolviĝon de la Esperanto-Movado en Germanio.



Nationalsozialistische Deutsche Arbeiterpartei

Der Stellvertreter des Führers

München, den 13. Februar 1936

"Rejnlanda Vespero" dum la 25-a UK en Kolonjo, 1933: Tiutempe malmultaj pensis pri la fundamenta malakordo inter la verda stelo kaj svastiko.



en Düsseldorf pro preparoj al perfido, troviĝis ne malpli ol 29 esperantistoj. Ĉar ne eblas kontroli la korespondadon de la — ĝenerale suspektindaj — esperantistoj, Heydrich rekomendis dissolvi kaj malpermesi la Esperanto-unuiĝojn kaj konfiski ilian havaĵon.

Skrupulojn kontraŭ ago en tiutempa stadio havis ĝuste la propagandministro Goebbels; en letero de la 23-a de oktobro li esprimis jenajn atentindajn argumentojn:

> Inter la milionoj da adeptoj de Esperanto en eksterlando certe troviĝas tre granda nombro, kiu estas nepolitika kaj vidas nur la ideon flankon de la strebadoj de Esperanto. Pro agado iliaopinie tute sendanĝera, kia ja estas la lernado de nova lingvo, ĉiuj ĉi homoj havos la impreson, ke en Germanio eĉ tiaj asocioj estas persekutataj. Tiun opinion kompreneble montros sennombraj skribaĵoj, kiujn la Esperanto-unuiĝoj disvastigas en la tuta mondo. Ankaŭ la eksterlanda gazetaro utiligos tiun okazon por propagandi kontraŭ Germanio.

Sekve, anstataŭ oficiala malpermeso, Goebbels rekomendis („kun iom da premo") libervolan dissolviĝon de Esperanto-asocioj. Ĉar tio ne tuj okazis, Heydrich insistis, per letero al Rudolf Hess, la 21-an de januaro 1936, ke esperantistoj plue aktivas kontraŭ la ŝtato: en Münster 44 membroj de komunista grupo estis arestitaj, kaj loka grupo de GEA en Bottrop estis dissolvita pro distribuo de flugfolioj fare de iamaj laboristaj aktivuloj. Kvankam dissolvo de GEA „nuntempe ankoraŭ ne estas intencata", Heydrich petis partian ordonon kontraŭ membreco de partianoj en Esperanto-organizaĵoj kaj (al Goebbels) „propagandon" kontraŭ GEA. Efektive, baldaŭ plioftiĝis la atakoj kontraŭ Esperanto en la nazia gazetaro, kaj la 18-an de februaro 1936 la stabestro de la anstataŭanto de la *Führer,* Martin Bormann, eldonis jenan dekreton (n-ro 29/36):

> Ĉar la kreo de internacia mikslingvo kontraŭas al la bazaj konceptoj de la nacisocialismo kaj finfine povas servi nur al supernaciaj potencoj, la anstataŭanto de la *Führer* malpermesas al ĉiuj partianoj kaj membroj de la organizoj filiigitaj al la partio apartenon al ĉiuspecaj unuiĝoj de artefarita lingvo.

Interna cirkulero de la Politika Polico de la 24-a de aprilo rekonfirmis, ke „pro ŝtatpolitikaj kaŭzoj" oni tiutempe ne intencis ĝeneralan malpermeson de Esperanto-organizaĵoj, rajtigante tamen la lokajn Gestapo-oficejojn dissolvi unuopajn grupojn, kies membroj agis aŭ ankoraŭ agas kontraŭ la ŝtato. Sed ĉar, laŭ Heydrich, daŭris la nekontrolebla nelaŭleĝa aktiveco de membroj de Esperanto-asocioj, li decidis doni al la jam mortanta Movado la lastan baton: la 20-an de junio 1936 li dekretis, nome de Himmler, ke ĉiuj unuiĝoj de arte-

faritaj lingvoj kaj iliaj subgrupoj devas esti likviditaj (proprainiciate) ĝis la 15-a de julio 1936.

Heydrich triumfis ne nur kontraŭ Esperanto, sed ankaŭ kontraŭ Goebbels, kies atendeman taktikon li malpravigis per atentigo pri tio, ke okazis nur unusola „enmiksiĝo de la eksterlanda gazetaro"....

21.3.2 Persekutoj en Landoj sub Nazigermana Influo

Kiam Aŭstrio estis aneksita, ordono el Berlino de la 1-a de aŭgusto 1938 sufokis ankaŭ la tiean Esperantan vivon. Notinde estas, ke la dekstra Aŭstria Esperanto-Asocio (sub Hugo Steiner) estis „petita" mem likvidi sin, sed ke la iom pli maldekstra Aŭstria Esperantista Federacio estis perforte dissolvita (ĝi kolektis i.a. iamajn membrojn de Aŭstria Laborista Ligo Esperantista, kies detruon estis jam prizorginta en 1934 la reĝimo de Dollfuss). SS-anoj fermis, la 20-an de aprilo 1938, la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno. Pli malfrue, verŝajne sekve de denunco, gestapanoj arestis kelkajn esperantistojn, kiuj kunvenis en la hejmo de la iama ĉefdelegito de Internacia Esperanto-Ligo, Gustav Weber; ĉiuj estis transportitaj en koncentrejon. Weber mem mortis, post teruraj suferoj kaj en mensa perturbiĝo, nur 14 tagojn antaŭ la liberiĝo — unu el tiuj, kiuj nur pro Esperanto fariĝis viktimoj de la Tria Regno.

Nelonge post la okupo de Sudetlando, la Gestapo-ĉefoficejo informiĝis pri tie ekzistantaj Esperanto-organizaĵoj; evidentiĝis, ke Germana Esperanto-Ligo estis tiutempe jam dissolvita per surloka iniciato, la 16-an de decembro 1938. Preskaŭ du jarojn poste, la 13-an de novembro 1940, likvida dekreto trafis ankaŭ Ĉeĥan Esperanto-Asocion.

Kiel videblas el cirkulero de la Departemento de Internaj Aferoj en Hago (21/22-7-1941), Nederlanda Esperanto-Asocio („LEEN") estis dissolvita per dekreto de la Komandanto de la Sekureca Polico kaj Sekureca Servo por la Okupitaj Nederlandaj Teritorioj (20-3-1941). La havaĵo de Esperanto-organizaĵoj estis aŭ detruita aŭ, nome parto de la libraro de LEEN, sendita al Berlino (11-8-1942), kie oni destinis ĝin por la biblioteko de *Hohe Schule der NSDAP*. Pri la plenumo de la dekreto respondecis la „referatestro" Werner Schwier; laŭ la raporto de Andreo Cseh pri la fermo de Internacia Esperanto-Instituto en Hago („apudorganizaĵo de la framasonaj loĝioj"), Schwier fanfarone deklaris, „ke li jam neniigis la Esperanto-Movadon en Germanujo kaj Polujo, kaj li minacis nin per aresto kaj koncentracia kampo, se ni pledas por Esperanto". Meze de 1941 ankaŭ Flandra Ligo Esperantista estis malpermesita, ĝuste kiam ĝi finpretigis la sesan nelaŭleĝan numeron de sia organo; tamen, ekde

decembro 1941 la grupo en Bruĝo kaŝeldonis la bultenon *Paco kaj Justeco.*

Ankaŭ en Bulgario, formale sendependa ŝtato malgraŭ alianciĝo kun Hitlera Germanio, la nazioj demonstraciis sian potencon por elimini eĉ tiun restaĵon de Esperanta vivo, kiun toleris la bulgara reĝimo: en februaro 1942 Radio Sofia estis vizitita de la germana kultura ataŝeo, kiu urĝe konsilis ĉesigi la esperantlingvajn disaŭdigojn. Jam la saman vesperon ilia prizorganto estis sciigita pri la ĉesigo de la elsendoj pro „sugesto de altaj aŭtoritatoj".

Apartan atenton meritas la evoluo en Italio, ĉar dum la unuaj jaroj de faŝisma regado la Esperanto-Movado multe prosperis, organizante kursojn en gazetoj kaj radio kaj rikoltante plurajn oficialajn rekonojn. Sed, por daŭrigi sur tiu vojo, jam komence de 1936 Itala Esperantista Federacio kredis sin devigita mem propagandi por la reĝimo kaj peti simpation de la tutmonda esperantistaro al la konkera milito en Etiopio. En 1936 kaj 1937 ne okazis naciaj kongresoj, kaj la planitan 21-an Kongreson en Torino malokazigis burokrataj ĉikanoj, en 1939. Evidente en ligo kun la kreskanta influo de Germanio, atakoj kontraŭ Esperanto eniris la kolumnojn de italaj gazetoj: *Il Popolo d'Italia* subite eltrovis, ke la ekzisto de Zamenhof-strato en Milano „insultas Romon, kiu por la rilatoj kun aliaj popoloj posedas aliajn pontojn". La fino venis rapide: IEF devis eksigi siajn judajn membrojn, ministeria dekreto „interrompis" en 1939 la eldonadon de *l'esperanto,* ĉesis la ĉiusemajnaj radio-elsendoj de Romo, kaj dum la milito oficiala movado tute malaperis.

21.3.3 La Strategio de Heydrich

Kion instruas studo de la aktoj de la Sekureca Polico? Unuavice oni povas dedukti, ke la kontraŭfaŝisma rezistado de esperantistoj estis multe pli ampleksa ol estis ĝis nun konate. Avangardan rolon ludis sendube la iamaj aktivuloj de GLEA kaj SEA, el kiuj verŝajne nur malplimulto sin kaŝis en GEA aŭ NDEB; pli multaj utiligis la malpermesitajn, sed pluekzistantajn ĉelojn por la subtera batalo. Ekz. el grupo de berlinaj GLEA-funkciuloj evoluis rezista organizaĵo, kiu daŭrigis sian laboron ĝis 1942/43. Aliaj konservis inter si kontakton per sekretaj renkontiĝoj en privataj loĝejoj, eĉ en banejoj kaj arbaroj; tre utilaj montriĝis la internaciaj rilatoj: politikajn persekutatojn oni direktis helpe de Esperanto al eksterlando, kaj en Hamburgo maristoj kontrabandis al lokaj esperantistoj kontraŭleĝajn broŝurojn. Sekve longa estas la listo de tiuj, **kiuj estis arestitaj kaj** suferis en malliberejoj kaj koncentrejoj; granda nombro ne transvivis la „Miljaran Regnon". Plurfoje tiaj viktimoj spertis, ke Gestapo

nomis Esperanton „sekreta lingvo de komunistoj", tiel ke ili ofte ricevis pli severan trakton ol iliaj neesperantistaj kamaradoj.

Kontraŭ la konkludo, ke GEA estis malpermesita, ĉar ĝi ne sukcesis liberigi sin de membroj malamikaj al la reĝimo, tamen altrudas sin alia konsidero, nome ke Heydrich intence trogravigis la ekziston de marksistaj elementoj en la germana Esperanto-Movado — por povi tiel pli rapide atingi sian ĉefan celon, al kiu la konservativa burokratio ankoraŭ malinklinis: komplete frakasi la tutan Movadon. Kontraŭ grandskala infiltriĝo de GEA per socialistoj, simple parolas la fakto, ke la sennaciisto Lanti — pro sia nova teorio, ke flegado de Esperanto pli gravas ol klasbatalo — eksplicite rekomendis al SAT-anoj ja membriĝi, sed ne agi politike en neŭtralaj Esperanto-grupoj, kaj ke, pro singardemo, GEA (kiu cetere konstante perdis membrojn) apenaŭ emis allasi amasan aliĝadon de personoj pli frue konataj kiel anoj de GLEA, SEA aŭ SAT. La statuto de GEA de 1935 klare malebligis membrecon de „marksistoj", kaj kiam multjara aŭstra ano de GEA proteste eksiĝis el la asocio, ĝia gvidanto respondis al li germanlingve: „Mi tre bedaŭras, ke mi ne havas la eblon transdoni vin al la germana polico!"

Heydrich, kiun obsedis la imago pri kontraŭgermana konspiro de la tutmonda Judaro, estis per siaj agentoj certe pli bone informita pri la interna strukturo de GEA kaj pri la mentaleco de ĝiaj ĝenerale etburĝaj membroj. Ĉu agas en ĝi manpleno da marksistoj aŭ ne, apenaŭ povis esence influi lian bazan konvinkon, ke Esperanto estas eltrovaĵo de Judo, subtenata de Judoj kaj sekve ekstermenda. Por li ĉiuj aktivaj esperantistoj estis malamikoj de la ŝtato, ĉar nur tiaj povas interesiĝi „pri la propagando, tute superflua kaj akre rifuzenda laŭ nacieca starpunkto, de universala lingvo por la homoj de ĉiuj popoloj kaj rasoj" (1935). Lia insistado pri detruo de la Esperanto-Movado okazis paralele kun lukto por plifortigita pozicio de Gestapo kaj SS en la ŝtato: tiun celon Himmler kaj Heydrich atingis, la 17-an de junio 1936, per starigo de la institucio *Reichsführer SS und Chef der Deutschen Polizei*. Tri tagojn poste estis dekretita la definitiva malapero de GEA.

En interna retrospektiva raporto de 11 tajpitaj paĝoj pri Esperanto *Reichssicherheitshauptamt* (ekde septembro 1939 centro de Sekureca Polico kaj Sekureca Servo) notis, la 8-an de junio 1940, ke estis „tute erara opinio" de naciemaj esperantistoj akceli Esperanton „en ŝtatutila senco" kaj ke la membraro laborista, ne sciante uzi la lingvon profesie, „utiligis ĝin por sia ilegala politika agado". La raporto montras detalan konon de Zamenhof kaj lia homaranismo kaj ekz. relative trafe difinas UEA kiel „internacian unuiĝon de burĝaliberalisma karaktero por neŭtrala apliko de Esperanto sur la kampo de turismo ktp.".

21.3 "LINGVO DE JUDOJ KAJ KOMUNISTOJ"

Restas la demando, ĉu la nazioj pretis toleri Esperanton kiel nurnuran lingvon. La 27-an de aŭgusto 1936, Heydrich komunikis: „La uzo de Esperanto en privata korespondado ne estas kontraŭstarebla, kondiĉe ke tio ne okazas kun kontraŭŝtata intenco aŭ por akceli la kuniĝon de la esperantistoj." Kaj la 1-an de julio 1937, Gestapo refoje deklaris, ke „malpermeso de la apliko de Esperanto ĝis nun ne okazis kaj kredeble ankaŭ ne okazos". Sed tiaj „permesoj" apenaŭ havis praktikan valoron: ili nek iĝis vaste konataj nek malhelpis individuajn ĝenojn de lokaj gestapanoj. Tial ni scias kaj pri esperantistoj, kies korespondado ne spertis malhelpojn, kaj pri iuj, kiuj estis vokitaj al Gestapo pro abonado al eksterlandaj Esperanto-revuoj aŭ kiuj ricevis skriban ordonon ĉesigi ĉian privatan okupiĝon pri Esperanto, kaj eĉ pri unu, al kies nederlanda korespondanto la germana ambasodoro rekomendis daŭrigi la interŝanĝon de leteroj en germana lingvo.

La faktan staton resumis en dokumento de la 3-a de junio 1939 la oficejo de *Reichsführer SS:* „Disvastigo de Esperanto en Germanio estas malpermesita." Kaj la raporto de 1940 nete konstatis:

> Konsideri „Esperanton" nur kiel helplingvon por la internacia trafiko estas malĝuste. La artefarita lingvo Esperanto estas parto de la esperantismo, de la armilo de la Judoj.

Kiom intertempe severiĝis la sinteno de Heydrich, tion povis persone sperti la svisa ĵurnalisto D-ro Hans Unger. Kiam post renkontiĝo kun dekduo da esperantistoj en berlina kafejo li estis vokita al la ĉefoficejo de Gestapo, Heydrich kulpigis lin pri provoj organizi „internacian reton" kontraŭ la Tria Regno. La vortojn de Unger, ke frapus la konsciencon de la tuta homaro, se nur pro uzado de Esperanto oni sendus homon en koncentrejon, Heydrich akre interrompis: „Nia konscienco estas germana, kaj nur laŭ ĝi ni agas. La 'homara konscienco' estas juda kreitaĵo kaj ne interesas nin!" Similajn insultojn Unger poste aŭdis de Rudolf Hess, kiu krom tio sciigis al la Sviso fantazian planon pri simpligita germana lingvo altrudota al tuteŭropa ŝtata federacio sub nazigermana hegemonio.

Heydrich ekpaŝis al fina solvo de la „monda danĝero Esperanto". Kelkajn tagojn post la okupo de Varsovio, SS-anoj vizitis la Judan Hospitalon, demandante pri D-ro Adam Zamenhof. La filo de la aŭtoro de Esperanto estis arestita, la saman tagon ankaŭ liaj edzino Wanda kaj fratinoj Zofia kaj Lidja. Escepte de Wanda kaj ŝia filo Ludoviko, ĉiuj pereis en germanaj koncentrejoj, kaj kune kun ili miloj da judaj esperantistoj en Pollando. Ke la aresto de la familio Zamenhof ne fontis en ia hazardo, sed estis zorge planita, oni eksciis nur post la milito de unu el la ĉeflikvidistoj: La estinta SS-kolonelo Joseph Meisinger, kiu de oktobro 1939 fiservis kiel komandanto de la

Sekureca Policо en Varsovio, konfesis al la pola prokuroro Siewierski, ke la malliberigo de la familio okazis laŭ speciala ordono el Berlino — kredeble, do, el la oficejo de la ĉefo de la Sekureca Policо kaj Sekureca Servo, Reinhard Heydrich.

21.3.4 Persekutoj en Hispanio, Portugalio kaj Jugoslavio

Rigardo al ideologiaj parencoj aŭ politikaj aliancanoj de Hitlera Germanio montras, se ne grandskalajn persekutojn, almenaŭ tre suspekteman rilaton al Esperanto. Dum la Civila Milito en Hispanio, kiun partoprenis, sur respublikana flanko, i.a. la prezidanto de Hispana Esperanto-Asocio, Julio Mangada-Rosenörn, kaj multaj eksterlandaj esperantistoj, la falangistoj mortpafis la tutan membraron de la Esperanto-grupo en Cordoba. La ekscitiĝon en eksterlando klopodis trankviligi oficiala informo, ke Franco „sentas nenian antaŭjuĝon", sed eĉ simpatias kun Esperanto. Tamen, la lingvo restis suspektata ĝis 1947, kiam laŭleĝe fondiĝis Hispana Esperanto-Federacio, kaj post 14-jara paŭzo, en 1951 denove okazis kursoj en la ĉefurbo Madrid. Aliflanke, ankoraŭ en 1949 la Universitato de La Laguna (kie nun funkcias oficiala katedro de Esperanto) malpermesis Esperantan kurson, ligante al la lingvo nebulajn ideojn pri „internaciismo kaj maldekstrismo politika".

Same en Portugalio, en aŭtuno 1936, ĉiuj esperantistaj societoj estis fermitaj, la ejoj sigelitaj, kaj policistoj tage kaj nokte gardostaris antaŭ la pordoj. Malgraŭ dumtempa malseveriĝo, ĝis la morto de Salazar regis la ideo, ke Esperanto estas en si mem politike tendenca; ĉio, kio nur aspektis esperantlingva, estis konfiskita. Dekreto de la Ministro de Internaj Aferoj de la 11-a de aŭgusto 1948 turnis sin kontraŭ „iuj ajn aktivaĵoj aŭ presaĵoj esperantistaj", kaj du monatojn poste la Ministerio de Edukado malpermesis la instruadon de Esperanto en Portugalio. Agentoj de la sekreta policо traserĉis la loĝejojn de esperantistoj, transprenis ĉiujn esperantaĵojn kaj konfiskis, en aŭgusto 1949, la arkivon, bibliotekon kaj ceteran dokumentaron de Portugala Esperanto-Ligo. Eĉ leteroj el eksterlando, surhavantaj glumarkojn aŭ aliajn indikojn en Esperanto, neniam atingis siajn adresatojn.

Komence de la 1930'aj jaroj, en la periodo de la reĝa diktaturo en la politika sistemo en Jugoslavio kaj, poste, de duonfaŝisma reĝimo, ankaŭ la Esperanto-Movado en Jugoslavio estis submetita al diversaj malhelpoj, precipe sur la loka nivelo. Tio estis la periodo de interna reorganiziĝo de la Esperanto-Movado en tiu lando. Esperantolegaĵoj estis konfiskataj ĉe esperantistoj el demokrataj, liberalaj kaj laboristaj rondoj. En diversaj regionoj de la lando la policо ofte

traesploris la hejmojn de personoj, kiuj gvidis Esperanto-societojn aŭ intencis fondi tiajn. Ricevinte peton aprobi la statuton de unu novfondita grupo, en 1932, la Banuslanda Administracio[2] en Zagreb motivis sian malpermeson jene:

> ....ekzistas nek naci-kultura nek socia bezono fondi tian klubon el kamparanoj kaj metiistoj en Djelekovec, ĉar ekzistas diversaj naciaj, kulturaj, ekonomiaj kaj sociaj aspiroj, pri kiuj devas esti interesigita nia ethomo. Li devas esti instruata pri klerigo kaj kulturo, sed ne per la instruado de iu malviva artefarita lingvo (Esperanto), por kiu estas postulata antaŭa instruiteco kaj kono de almenaŭ unu reganta viva mondlingvo.

Ĉi tie frape montriĝas la tendenco de reakciaj aŭtoritatoj bremsi la emancipiĝon de homoj el neprivilegiitaj tavoloj, mem dikti al ili sian vojon al klerigo kaj subfosi ĉion, kio kondukas al propra-iniciata larĝigo de intelekta nivelo kaj al internaciaj kontaktoj.

Tamen, Jugoslavia Esperanto-Ligo (JEL) — spitante la malpermesojn kaj persekutojn fare de la duonfaŝisma reĝimo, kaj apogante sin nur sur siaj propraj fortoj, sur la bonvolo kaj kuraĝo de siaj membroj — disvolvis tre sukcesan laboron kaj fariĝis unu el la plej fortaj, certe la plej progresema landa asocio. Ĝiaj funkciuloj kaj aliaj gvidantoj (D-ro Lapenna, Inĝ. Borjan, D-ro Škatarić, Turković, Grandja k.a.) avertis en *La Suda Stelo* kontraŭ la kliniĝo de la gvidantoj de la Esperanto-Movado en la faŝismaj landoj kaj kontraŭ la pasiveco de UEA kaj IEL antaŭ faŝismo. Ili postulis revizion de la tiama komprenado de neŭtraleco, kiu fakte identis kun senprotesta akcepto de la persekutoj, en kelkaj kazoj eĉ kun laŭdado de la persekutaj reĝimoj. En *La Suda Stelo* de junio 1937 Lapenna skribis, ke „la esperantistoj estas persekutataj kaj eĉ mortigataj nur tial, ĉar ili en alinacianoj rigardas homojn kaj ne malsuperajn estaĵojn, homojn, kun kiuj ili deziras interŝanĝi ideojn, kontaktiĝi, amikiĝi kaj kunlabori anstataŭ reciproke detruiĝi". *La Suda Stelo* de marto 1938 forte kritikis iun Esperanto-gazeton, kiu flatis diktatorajn reĝimojn, ĉar „ili havas pli grandan aŭtoritaton kaj ĝenerale ankaŭ pli grandan konstantecon, ol la registaroj demokrataj", kaj tial „sukceso por nia afero ĉe tiuj registaroj havas esence pli gravan signifon, ol sukceso ĉe iu demokrata ŝtato". Analizinte la karakteron de la tiamaj persekutoj, *La Suda Stelo* konkludis: „Se ni ne povas redoni la ricevitan vangofrapon, ni almenaŭ ne humiliĝu antaŭ tiuj, kiuj nin batis. Kontraŭe, ni fieru, ke ili — ne konsentas kun ni."

2. Banuslando („Banovina") estis tiam larĝa administra-teritoria unuo (regiono) en Jugoslavio. La Banuslanda Administracio estis la plej alta ŝtata aŭtoritato en la regiono.

21 PERSEKUTOJ KONTRAŬ LA INTERNACIA LINGVO

Tiu demokrata, kontraŭfaŝisma kaj ĝenerale kontraŭdiktatoreca tendenco ne restis kaŝita antaŭ la Ministerio pri Internaj Aferoj, kiu konstatis dum polica konferenco de la 2-a kaj 3-a de julio 1938:

> Lastatempe estas rimarkita ankaŭ aparta fenomeno de maldekstrula propagando pere de unuopaj Esperanto-societoj.... En konkretaj kazoj oni devis apliki eĉ la lastan rimedon — disigon de unuopaj Esperanto-societoj. La Ministerio por Internaj Aferoj per siatempa cirkulero atentigis la regionajn aŭtoritatojn pri ĉi tiu fenomeno, postulante la plej konsciencan kontrolon de la agado de la unuopaj Esperanto-societoj kaj de iliaj funkciuloj, kaj ankaŭ ĉi-okaze substrekas la neceson de tia kontrolo.

Sekvis pluraj malpermesoj de Esperanto-organizaĵoj, dum aliaj, ekzemple la Laborista Esperanto-Societo en Osijek, estis malpermesitaj jam pli frue. Spitante la plimultiĝantajn malpermesojn, JEL fondadis novajn societojn. Ĝi ne cedis, sed postulis de siaj membroj kontraŭbatali „tiujn, kiuj persekutas nian Movadon". La Rezolucio de la 12-a Jugoslavia Esperanto-Kongreso en Karlovac (majo 1939), unuanime akceptita, firme esprimis la volon de la jugoslaviaj esperantistoj „klare diferencigi amikojn disde malamikoj, kaj defendi Esperanton". En la Rezolucio estis konstatite, ke jam pli frue Esperanto estis malpermesita en pluraj landoj kaj ke, jen, denove aliaj landoj estis perditaj por la Movado, sed ke IEL neniam protestis. La Rezolucio, kiu estis prezentota al la Universala Kongreso en Bern (1939) postulis, ke oni klare difinu la pozicion de la Esperanto-Movado kaj ke oni kontraŭbatalu tiujn, kiuj persekutas ĝin. *La Suda Stelo* de julio 1939 eĥis: „Estas necese jam foje kuraĝe kaj senhezite diri, ke ni konscias pri la proksimiga socia rolo de nia lingvo, kaj ke ni ne nur ne hontas, sed kontraŭe, ke ni fieras pro ĝi! Ni ĉesu jam esti senvertebruloj, ĉar alie ni ne nur ne sukcesos pligrandigi kaj plifortigi la Movadon, sed eĉ ni mem perdos la kredon je ĝi".

La Suda Stelo mem estis viktimo de persekutoj. La polico en Slavonski Brod, kie la revuo estis presata, proponis al la Banuslanda Administracio en Zagreb, Departemento pri Internaj Aferoj, ke *La Suda Stelo* estu malpermesita. Laŭ la tiama presleĝo tio tamen ne estis ebla, ĉar ĝi antaŭvidis, ke oni povas komplete malpermesi nur tiun gazeton, kiu dum unu monato estis tri fojojn konfiskita. Kaj *La Suda Stelo* estis monata periodaĵo, do ne povis estis konfiskita tri fojojn en unu monato. Tial la Departemento en Zagreb konsilis al la polico en Slavonski Brod, ke ĝi trovu ian pretekston por konfiski unuopajn numerojn. La polico sekvis tiun konsilon kaj per sia Dekreto n-ro 7740 de la 7-a de septembro 1938 konfiskis la n-ron 9 de septembro 1938. Poste sekvis konfiskoj de aliaj unuopaj numeroj.

21.3 "LINGVO DE JUDOJ KAJ KOMUNISTOJ"

Grandaj estis la perdoj post la germana invado en aprilo de 1941. Unu tagon post la eniro de la naziaj trupoj en Zagreb, la 11-an de aprilo 1941 la kroataj faŝistoj (ustaŝoj) frumatene sigelis la ejojn de JEL kaj de Akademia Esperanto-Klubo en Zagreb. Tamen, du funkciuloj de JEL, spitante la danĝeron, la saman tagon lerte formovis la sigelojn, eniris en la ejojn, forprenis la liston de la tuta membraro kaj ĉiujn protokolojn, por ke ili ne venu en la manojn de la faŝista polico, kaj same lerte resigelis la pordojn. Tio al multaj membroj donis tempon por eviti areston kaj malaperi. Ĉiuj Esperanto-organizaĵoj estis malpermesitaj, kaj ilia havaĵo konfiskita kaj grandparte detruita. Tre multaj esperantistoj estis arestitaj, deportitaj aŭ ekzekutitaj. Inter la unuaj viktimoj de la nazia-ustaŝa teroro troviĝis Inĝ. B. Borjan, Š. Turkovič, Nada Heiligstein, D-ro A. Škatarić kaj tuta aro da aliaj esperantistoj. La grandega plimulto de la jugoslavia esperantistaro aliĝis al la Naciliberiga Movado kaj ĝiaj partizanaj taĉmentoj. Almenaŭ 300 falis en la batalo aŭ estis mortigitaj en karceroj kaj koncentrejoj.

Eĉ en la tre malfacilaj kondiĉoj de la partizana milito en Jugoslavio, ne tute ĉesis la laboro por Esperanto. En 1943, je distanco de kelkdeko da kilometroj for de la batallinio, en Livno okazis en 1943 Esperanto-konferenco, kiun partoprenis dudeko da esperantistoj, troviĝantaj en tiu urbeto aŭ en ĝia ĉirkaŭaĵo. Inter ili troviĝis la prezidanto de JEL kaj la prezidantoj de kvar Esperanto-societoj, ĉiuj, kiel dirite, disigitaj kaj malpermesitaj de la ustaŝa reĝimo. En alia kazo, jugoslavia esperantisto (J. Kozlevčar, la prezidanto de la disigita klubo en Ljubljana) eĉ instruis la lingvon en nazia koncentrejo en Germanio.

La senkompromisa kaj firma sinteno de la Jugoslavia Esperanto-Movado estas honorinda ekzemplo de rezisto en la tiama pasiveco de la neŭtrala Esperanto-Movado. Laŭ siaj kompreno kaj agoj, la ĝenerala Esperanto-Movado ja devas baziĝi sur la principo de neŭtraleco, sed la neŭtraleco finiĝas tie, kie komenciĝas la rektaj atakoj kontraŭ Esperanto kaj persekutoj kontraŭ la Esperanto-Movado [3].

3. *Noto de la red.* Por kompreni la signifon de la koncepto „maldekstrulo" en diversaj dekretoj kaj aktoj de la polico, necesas diri, ke la tiama reakcia reĝimo aplikis la esprimon „maldekstruloj" al ĉiuj, kiuj troviĝis „maldekstre" de tiuj ekstreme dekstraj politikaj elementoj. Do, ne nur la komunistoj kaj socialistoj de diversaj nuancoj, sed ankaŭ ĉiuj demokrataj kaj liberalaj fortoj estis rigardataj kaj persekutataj kiel „maldekstruloj". Ĝuste tio kunigis la opoziciajn fortojn kaj poste, ekde 1941, ebligis la formiĝon de amasa naciliberiga movado.

21.3.5 Rolo de Antisemitismo

Aparta ĉapitro estas, krom la inerteco de la „neŭtralaj" esperantistoj ekster Germanio — la supre cititaj zorgoj de Goebbels pri la potenco de „milionoj da adeptoj de Esperanto" supozigas, ke per forta protesto ili estus povintaj mildigi almenaŭ la ĝenojn al nepolitika apliko de la lingvo —, tiuj sociaj faktoroj, kiuj sendepende de registara premo kontraŭstaris disvastiĝon de la Internacia Lingvo. Temas unuavice pri la antisemitismo, pli-malpli latente reganta en multaj, ankaŭ demokratiaj landoj de Eŭropo, kiu nutris inter larĝaj tavoloj antipation kontraŭ Esperanto kaj sekve servis kiel forta bazo por influi la oficialan sintenon ankaŭ de „esperantema" registaro.

Spertis tion la pola registaro, kiun dekstraj gazetoj akre atakis pro tio, ke ĝi permesis organizi „jud-komunistan" kongreson, t.e. la Oran Jubilean Kongreson en Varsovio (1937). Pli frue, en majo 1934, enketo de la Esperanto-instruisto en gimnazio en Bydgoszcz inter lernantoj, kiuj ne volis preni Esperanton kiel instruobjekton, havis konsternan rezulton. Motivante sian decidon, la gimnazianoj montriĝis jam nekuraceble infektitaj de kontraŭjudaj sentoj:

....ĉar ĝi estas juda ĵargono, kiun ni devas malŝati.

Esperanto servas al kontraŭreligia propagando. Esperantistoj estas plej ofte Judoj aŭ ateistoj. Esperanton oni devas ĝisgrunde detrui.

....mi estas granda antisemito, mi ne ŝatas pro tio Esperanton.

ĉar ĝi estas laŭ mia opinio cionisma eltrovaĵo por pli facila disvastigo de komunismo, framasoneco kaj aliaj malutilaĵoj.

21.3.6 Persekutoj en Ĉinio kaj Japanio

Ĉinio kaj Japanio estas la solaj ekstereŭropaj landoj kun lingvoj nehindeŭropaj, kie Esperanto-Movado funkciis, sen tro longaj periodoj de stagnado, ekde la komenco de tiu ĉi jarcento. Ke la lingvo ne restis nur bela ludaĵo por okcidentemaj intelektuloj, plej evidente montriĝas en la intensa atento, per kiu la aŭtoritatoj ankaŭ en orienta Azio sekvis la aktivecon de esperantistoj kaj precipe ilian efektivan aŭ supozatan ligitecon kun revoluciaj strebadoj.

Kiel ni vidis, ĉinaj esperantistoj estis suspektataj kaj fojfoje sange persekutataj en reakcia ondo post la falo de la imperiestra dinastio. La lingvo per si mem estis suspektinda, ĉar ĝiaj unuaj pioniroj en Ĉinio preskaŭ senescepte estis anarkistoj kaj socialistoj, kaj ankaŭ en la 1920'aj kaj 1930'aj jaroj la influo de maldekstruloj restis tiel superrega, ke pri ekzisto de „burĝa" resp. neŭtrala Es-

peranto-Movado apenaŭ eblis paroli. Sekve, ĉiufoje, kiam la reĝimo de Ĉiang kaj-ŝek rompis unu taktikan aliancon kun la komunistoj, ankaŭ esperantistoj iĝis viktimoj de la severiĝo de la enlanda klimato.

La sekreta polico de Guomindang (Nacia Partio) ofte aperis en Esperanto-grupoj aŭ en novaj kursoj, vizitis esperantistojn en iliaj hejmoj, sekvis ilin tra la stratoj, kontrolis poŝtaĵojn, malpermesis kaj arestis.... Tiu sorto trafis eĉ esperantistojn, simpatiantajn al Guomindang. Multaj el la arestitoj neniam reaperis. Unu el la plej viglaj centroj, Ŝanhaja Esperantista Ligo, eskapis persekutojn nur dank' al tio, ke ĝia sidejo troviĝis en la angla koncesio. En 1941 la Militafera Komitato en Ĉongking organizis eĉ Esperantan kurson por anoj de la sekreta polico.

Sed la progreson de Esperanto en Ĉinio plej multe bremsis ĝeneralaj faktoroj kiel la politika nestabileco, la ekonomia mizero de la amasoj, la militoj. Dume, en Japanio, kun ĝia almenaŭ surface pli stabila sistemo enlanda, regis pli favoraj antaŭkondiĉoj por disvolviĝo de la Movado, ne pro tio ke mankis en ĝi revoluciemaj elementoj — tute kontraŭe —, sed ĉar apud ili plej malsamaj grupoj malkovris la utilon de Esperanto por siaj celoj: ekz. liberaluloj entuziasme akceptis ĝin kiel unu admirindan rezulton de okcidenta inventemo, naciistoj prenis ĝin por kontraŭbatali la lingvan imperiismon de Eŭropo, unuavice la „venenan" anglan lingvon („opio por la japana spirito"), kaj medicinistoj, sopirante al pli facila scienca interŝanĝo, ofte aperigis studojn aŭ resumojn en la Internacia Lingvo.

En 1914 disvastiĝis en Eŭropo onidiro, ke 17 japanaj esperantistoj estis pendumitaj pro kontraŭregistara ribelo. Kvankam tiu informo baziĝis sur miskompreno (la ekzekutitoj estis „kamaradoj", ne ankaŭ „samideanoj"), tamen restas la fakto, ke inter socialistoj, komunistoj kaj anarkistoj, kiujn observis aŭ arestis la polico japana dum trideko da jaroj, multaj parolis Esperanton aŭ simpatiis al ĝi; la plej eminenta el ili, Osugi sakae, estis kruele mortigita en 1923. Sed diference de Ĉinio, en Japanio establiĝis potenca kaj prestiĝa burĝa Movado, kiu, ŝanceliĝante inter nebula homaranismo kaj ĝisosta neŭtralismo, sukcesis sin protekti se ne kontraŭ popularaj antaŭjuĝoj („Esperantistoj similas akvomelonojn: ekstere verdaj, sed interne ruĝaj"), almenaŭ kontraŭ registaraj persekutoj.

Inter la pli ideologiemaj esperantistoj, ĉu dekstraj aŭ maldekstraj, Japana Esperanto-Instituto (JEI) tamen ne estis tre popularа. Proletoj plej forte atakis la „hipokritan" formon de la homaranismo de JEI kaj fine fondis, en 1931, Japanan Prolet-Esperantistan Union (JPEU), kiu baldaŭ poste iĝis suborganizaĵo de Federacio de Proletaj Kultur-Organizoj (KOPF). Severaj persekutoj kaŭzis jam en 1934 la pereon de JPEU; ĝin akcelis internaj eraroj, precipe

la neglekto de disvastigo de Esperanto favore al troa emfazo de aktuala politiko. Tiajn aventurecajn trajtojn forpuŝis restintaj aktivuloj, kolektiĝante ĉirkaŭ lokaj centroj kaj koncentriĝante al lingva ekzercado, sed la registara premo jam ne plu lasis lokon eĉ al tio: per persekuta ondo inter decembro 1936 kaj majo 1937 la organizita maldekstra Esperanto-Movado estis definitive frakasita. Nelonge antaŭ tio, sur alia flanko de la politika spektro, la japana Movado ricevis plian baton per la dissolvo de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto kune kun la tuta religia societo.

Pri tiuj persekutoj ekzistas abundaj dokumentoj de la polico kaj justico. Ekz., la monata raporto de la Justic-Ministerio pri (danĝeraj) pensoj regule listigis konfiskitajn Esperanto-revuojn kaj -librojn, precipe el eksterlando, indikante la kialon de malpermeso kaj kelkfoje eĉ pertraduke citante el la koncerna artikolo. Sed la plej grava dokumento estas la unika, 284-paĝa verko („strikte sekreta") de la prokuroro Takeuĉi Ĵiro, *Pri la Proleta Esperanto-Movado* (1939), kiu per la represitaj enket-protokoloj permesas detale sekvi la etapojn de agado kaj detruo de JPEU.

Multaj arestitoj estis per psikologia premo aŭ torturoj devigitaj promesi ĉesigon de ĉia kontraŭreĝima agado kaj kelkfoje ŝajnigis konvertiĝon al la ortodoksaj mitoj de Japanio por reakiri sian liberecon. Sed pluraj mortis en la karcero aŭ tuj post liberiĝo. Eble la plej tragika kazo estas tiu de Saito hidekacu, samtempe proletesperantisto kaj radikala protagonisto de latinigo de la japana skribo, kiu obstine rifuzis deklari sian konvertiĝon kaj eĉ malkonsentis aliĝi al JEI, ĉar „ĝi estas neŭtrala kaj mi maldekstra". Li pagis por sia kuraĝo per tuberkulozo; kiel solan, lastan „favoron" liaj persekutantoj donis al li liberecon, por ke li mortu en sia hejmo.

Tamen, multaj eksmembroj de JPEU submergiĝis en JEI — ĉu por lingve perfektiĝi aŭ daŭre informiĝi pri la en- kaj eksterlanda Movado aŭ, kiel avertis Takeuĉi, „por kamufli sian politikan koloron". Sekve, ankaŭ JEI kaj lokaj grupoj devis toleri vizitojn de policanoj, kiuj postulis membro-listojn, traserĉis bibliotekojn kaj kontrolis aliĝintojn al nova kurso. En la provinco ofte okazis, ke homoj estis almenaŭ vokitaj al la policejo pro tio, ke ili enskribiĝis por Esperanta kurso. Foje unu ĝendarmejo donis al libro-brokantejo Esperanto-vortaron — ne por vendigi ĝin, sed por ekscii pri aĉetemaj klientoj. Kien ne penetris la observemaj okuloj de la polico, tie ofte sufiĉis la suspektema rigardo de poŝtistoj kaj najbaroj por sufoki entuziasmon por Esperanto. En la provinco ricevo de eksterlandaj korespondaĵoj, egale el kiu lando kaj en kiu lingvo, per si mem entenis por la adresato la riskon de socia premo. Aliflanke, JEI mem kaj aro da grupoj, precipe en la grandaj urboj, ne povis multe plendi pri fortaj

La Historieto de Japana Latiniga Movado

H. Saito (斎藤秀一)

1. Latinlitero estis transportita al Japanio

1549-an jaron hispana misiisto Francisko Zavie (Francis Xavier) transportis unuafoje latinliteron al Kagoŝima-urbo (鹿児島) de Kjuŝuŭ (九州). En 1590, t.e. 40 jarojn pliposte italo Aleksandro Velenjani (Alessandro Velegnani) en-portis en japanion presilon kaj akompanis kun si kelkajn presmetiistojn kaj en Kazusa (加津佐) de Kjuŝuŭ li presis unuafoje libron por japana lingvo latinigita.

rnermesis ke nur tiu, kiu estis aprobita de registaro povas legi holandan libron escepte kristanismon. 1765 [Pri Eŭropano] (紅毛談) verkita de Gotoŭ Riŝun (後藤利春) estis malpermesita vendi pro la kaŭzo de enpreso de latinlitero, (Hakuseki kaj Mabuĉi diris pri latinlitero sed ne enpresis ĝin mem en siaj verkoj) La registaro timis ke popoloj, kiuj ne estis aprobitaj, ellerninte latinliteron el tiu verko, legus holandan libron.

Krom pridiritaj studistoj Kacuragaŭa Hosan (桂川甫粲) kaj Honda Toŝiaki (本田利明) ankaŭ skribis pri latinlitero en siaj

Artikolo de Saito hidekacu en la revuo *La Mondo* (Ŝanhajo, 1936): Pro siaj kontaktoj kun ĉinaj esperantistoj kaj latinigistoj li estis arestita de la japana polico kaj mortis sekve de karceraj suferoj.



Kalumnia kampanjo pro "komunista enfiltrado" en UEA: *Amerika Esperantisto* (1956).

Faŝismo minacis la sorton de la Movado: Kontraŭfaŝisma afiŝo el la hispana civila milito.



ĝenoj al sia laboro; neniam, laŭ nia scio, Esperanto estis oficiale stampita „danĝera lingvo". La teroro restis laŭokaza kaj nekunordigita, malatingante la stadion de tiaj sistemaj persekutoj, kiaj okazis, ekzemple, en Germanio.

Neskuebla fido pri la estonteco de Esperanto radias tra la protokoloj, kiujn devis subskribi la idealistaj viktimoj de senskrupula ŝtata aparato. Unu prizonulo, Nakacuka kiĉiĵi, kiu neniam plu estis reprenonta sian aktivecon, konfesis, ke por li Esperanto unuavice servis al klasbatalo; sed eĉ se la lingvo nun ne plu povas servi al tio, „la esperantistoj laŭ sia naturo amas demokration kaj estas por internaciismo" kaj sekve iom post iom redonos al ĝi tiun rolon. „La Esperanto-Movado ekzistos tiel longe, kiel vivas homoj kaj ekzistas socio...." Eĉ ioma emfazo de la idea flanko de Esperanto sekve tuj maltrankviligis la aŭtoritatojn: en septembro 1939 tri esperantistoj en Kumamoto estis arestitaj, ĉar — kiel notis la monata raporto de la Sekreta Polico — ili lerte „uzis la legalan Esperanto-Movadon", varbante inter neŭtralaj esperantistoj „por la kontraŭmilitaj kaj kontraŭfaŝismaj principoj de Zamenhof". En Osaka iamaj anoj de JPEU, kiuj kune studis la lingvon per *Fundamenta Krestomatio*, estis akuzitaj post komuna ekskurso al monto; tia ekzercado, memkomprenebla por fervoraj esperantistoj, evidente servis, laŭ la aŭtoritatoj, por reorganizi komunistan ĉelon.

JEI venkis provon de skismo de interne, kiam en decembro 1937 kelkaj oportunistaj kaj dekstremaj membroj klopodis starigi — mallongvivan — Esperantistan Patriotan Ligon, ĉar JEI rifuzis propagandi al eksterlando la „porpacajn celojn de la nuna milito en orienta Azio". Sed fine, dum la Pacifika Milito, JEI tamen sentis sin devigita aperigi deklarojn de la registaro pri la „sankta misio" de Japanio aŭ patriotisme heroajn poemojn — ĝis la milita evoluo necesigis la aperofinon de *La Revuo Orienta* en marto 1944.

Ke la ŝajne ĉionpova kaj ĉieesta polico malgraŭ energiaj klopodoj ne sukcesis estingi la fajron de poresperanta fervoro, montriĝis tuj en la fina konvulsio de la japana imperio. Kelkajn tagojn post la kapitulaco, jus antaŭ la eniro de usonaj trupoj, la polic-agentoj zorgoplene raportis pri revigliĝo de la „komunistema Esperanto-Movado".

21.3.7 Esperantistoj kontraŭ Esperantistoj

La ĝisnuna pritrakto povus kredigi, ke la Esperanto-Movado devis dum sia historio unuavice batali kontraŭ atakoj de ekstreme konservativaj kaj faŝismaj reĝimoj. Bedaŭrinde, ne estas tute tiel, ĉar, aldone al pasiveco per si mem negativa, troviĝis sporade eĉ en la

21.3 "LINGVO DE JUDOJ KAJ KOMUNISTOJ"

Esperanto-Movado mem individuoj aŭ grupetoj, kiuj helpis la persekutojn kaj kunlaboris en diversaj formoj kun la ekstreme reakciaj reĝimoj aŭ fortoj.

Unu el la kazoj estis tiu de tute sensignifa 13-homa grupeto da personoj, sciantaj Esperanton, el kelkaj slovenaj urboj, kiun gvidis Damjan Vahen. Tiu reakcia grupeto ludis negativan rolon en la antaŭmilita jugoslavia Esperanto-Movado, precipe post la landa kongreso en Zagreb (1937). Ĝi kunlaboris kun la tiama reĝimo kaj ne hezitis eĉ false denunci unuopajn gvidantojn de JEL. Kompreneble, same kiel en aliaj kazoj, tia sinteno ne helpis ĝin: ankaŭ ĝi estis likvidita de la nazioj.

Alia, multe pli grava, kazo estis tiu de Esperanto-Asocio de Norda Ameriko (EANA), ĉar ĝi kaŭzis malfacilaĵojn ne nur en Usono, sed ankaŭ internacie. Ekde 1949, dum la periodo de makartismo en Usono, precipe inter 1954 kaj 1956, EANA lanĉis kampanjon de falsaĵoj pro la kvazaŭa „komunista enfiltrado en la Esperanto-Movadon". La kampanjo estis direktita ĉefe kontraŭ Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA) kaj kontraŭ la pozicio de UEA, nun neŭtrala en pli pozitiva senco. ELNA kaj UEA estis sisteme atakataj kaj kalumniataj en *Amerika Esperantisto*, organo de EANA. Multaj el tiuj kalumniaj atakoj estis verkitaj en la angla lingvo kaj vaste diskonigitaj ankaŭ ekster la Esperanto-Movado. Gvidantoj de ELNA kaj de UEA estis grave kalumniataj, kaj la tiama ĝenerala sekretario de UEA estis eĉ false denuncita ĉe alilandaj sekurecaj servoj. La rezulto estis, ke la Komitato de UEA eksigis el la Asocio la ĝeneralan sekretarion de EANA, G. A. Connor, la animon de tiuj kalumniaj atakoj, kaj iom poste, konsiderinte la apelacion de G. A. Connor, konfirmis la eksigon per grandega plimulto de ĉiuj voĉoj kontraŭ 2. Samtempe la Komitato iniciatis la proceduron por eksigi EANA-n el UEA, sed tiu eksigo ne okazis, ĉar EANA mem eksiĝis. Paralele kun la formorto de makartismo en Usono, formortis ankaŭ la kampanjo de EANA [4], dum ELNA fortikiĝis kaj agas ĉiam pli pozitive en Usono. La Universala Kongreso de Esperanto en Portland (1972) okazis je la invito de ELNA.

4. Abunda dokumenta materialo pri tiu unika komploto, aparte ŝoka, ĉar ĝi estis organizita de grupeto da personoj en la kadro mem de UEA, troviĝas en la arkivo de CED kaj en la protokoloj kaj aliaj dokumentoj de UEA por tiu periodo.

21.4 „LINGVO DE CIONISTOJ KAJ KOSMOPOLITOJ"

21.4.1 Pereo de Esperanto en Soveta Unio

La agitado de kelkaj usonaj esperantistoj, adeptoj de ekstrema kontraŭkomunismo, tempe koincidis kun tre malrapida revekiĝo de Esperanto en Soveta Unio — post preskaŭ dudekjara silentado. Per tio ni venas al dua variaĵo de persekutoj kontraŭ Esperanto, flanke de reĝimo, kiu konsideris sin la avangardo de tutmonda socialismo.

Esplori la kialojn kaj detalojn de la stalinisma subpremado de la Internacia Lingvo montriĝas senkompare pli komplike ol analizi la persekutojn sub Hitler. La konsulteblaj dokumentoj estas ĉi-kaze minimumaj. Nek la soveta registaro nek la sovetaj esperantistoj publike eĉ konfesis la anatemon al Esperanto dum la periodo de „personkulto" — krom okazaj aludoj, ke la Movado „longe stagnadis" aŭ ke difinitaj personoj „tragike mortis", tiel ke ni preskaŭ komplete dependas de personaj memoroj, de supozoj kaj de aŭdacaj hipotezoj.

Al ĉi-lasta kategorio apartenas la klarigo de A. Malík, prezidanto de Esperanto-Asocio en ČSR, en 1950: „Estas ja konate, ke Sovetunio multe favoris Esperanton, ĝis kiam montriĝis reakcio en la rondoj de sovetaj esperantistoj, kiam oni konstatis, ke esperantistoj en Sovetunio — ne ĉiuj — helpis al spionada servo kontraŭ la ŝtato. Kie estas do la kulpo, ke en Sovetunio Esperanto-Movado velkis kaj mortis? La kulpo estas en la vicoj de la sovetaj esperantistoj, kiuj stariĝis kontraŭ la reĝimo."

Kun la faktoj respondas, ĝis certa grado, nur la unua duonfrazo: La rusaj esperantistoj, tradicie tre progresema elemento en la adeptaro de la Internacia Lingvo, bonvenigis la Oktobran Revolucion kiel plenumiĝon de unu kondiĉo por efektivigo de la slogano „Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!", esperante ke la nun liberigita laborularo plenumos ankaŭ la alian kondiĉon: havigon de unu komuna lingvo. Krome, ili kredis, ke Esperanto, se la juna Soveta Unio akcelas kaj aplikas ĝin, povos efike kontribui al la venko de socialismo en tutmonda kadro. Tiuj iluzioj, kiujn portempe nutris kelkaj favoraj decidoj de lokaj aŭtoritatoj, baldaŭ cedis al pli realismaj konsideroj. Kiam la partio kaj registaro proklamis la bezonon intensigi la internaciajn kulturajn rilatojn de laboristoj, Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU), fondita en 1921, rekrutis novajn esperantistojn en ĉiam pli multaj kursoj tra la tuta landego, alvokis siajn membrojn larĝe utiligi Esperanton por korespondado kun alilandaj proletoj kaj efektive ĝuis dum kelkaj jaroj oficialan apogon. Ankaŭ en la internacia Movado, en la kadro de SAT, kaj per pliriĉigo de la Esperanta literaturo SEU-anoj ludis elstaran rolon.

21.4 "LINGVO DE CIONISTOJ KAJ KOSMOPOLITOJ"

La angla lingvisto A. Thorburn konstatis komence de la 1930'aj jaroj, ke Esperanto estas en Soveta Unio same disvastigita kiel la germana lingvo. En 1931, statistiko pri 3.657 membroj de SEU en 587 lokoj indikis jenajn procentaĵojn: laŭ nacia deveno, 50% estas Rusoj, 22% Ukrajnanoj, 11% Judoj, 4% Kartveloj; la cetero estas anoj de 38 aliaj nacioj. Laŭ profesio, 33% estis laboristoj kaj 53% oficistoj. 74% estas viroj, 26% virinoj. Partianoj estas reprezentitaj en SEU per 17%, komsomolanoj per 23%.

Fine de 1934 SEU havis preskaŭ 9.000 registritajn membrojn. Ke ĝian laboron ĝenis gravaj malhelpoj, la Unio tiutempe nur ete aludis: „Dum la lastaj jaroj streĉo de la ekonomiaj fortoj de la lando efektiviginta sian unuan kvinjarplanon kaj efektiviganta la duan kvinjarplanon, kaŭzis, ke Esperanto estis atentata kaj subtenata nur en tiuj lokoj kaj fakoj, kie ĝi povis praktike servi al la celoj starigitaj antaŭ la lando."

La fino venis abrupte: Unua fulmobato okazis jam en 1935, kiam membro de la Centra Komitato de SEU, D. S. Sneĭko el Minsk, estis subite malliberigita kaj kondamnita al kvinjara punlaboro.

Sed tiu unua rimarkinda aresto ankoraŭ ne maltrankviligis la plej multajn sovetajn esperantistojn. Plene fidante la justecon de la reĝimo, ili konkludis, ke verŝajne Sneĭko iel ŝarĝis sin per kulpo. Kaj eĉ kiam E. K. Drezen, la prezidanto de SEU, kaj Herbert Muravkin estis arestitaj, pluraj trankviligis sian konsciencon, memorante ke la Latvo Drezen parolis la rusan kun fremda akcento, ke Muravkin longe studis en Germanio kaj portis iom tro kvalitajn vestaĵojn kaj ke ili do eble fakte havis rilatojn kun „kontraŭ-sovetaj elementoj". Entute, ĉu la aresto de Drezen okazis pro lia gvida rolo en la Esperanto-Movado, ne estas certe; kiel ne-Ruso, iama cara oficiro, postenulo en la Ruĝa Armeo (1918-21), sekretario de Kalinin (1921-24), direktoro de Instituto de Komunikado (1926-30), estrarano de Societo por Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando ktp., ofte vojaĝinta eksterlanden, li liveris tutan bukedon da kialoj por suspektiĝo kiel „spiono".

Sed atribui al la postaj okazaĵoj ankoraŭ ian racian bazon fariĝis pli kaj pli ne eble, ĉar la malliberigo de la gvidantoj trenis post si ĉiam pli multajn viktimojn: ne nur funkciulojn sur la loka nivelo, sed fine ankaŭ la grandegan nombron de ordinaraj membroj. La giganta aresta maŝino silente, sed nehaltigeble englutis la sovetajn esperantistojn. Malaperis kaj neniam plu revenis la CK-membroj N. Nekrasov, N. Incertov, la gvidanto de la ekspedejo de SEU, Petr Gavrilov, kune kun siaj teknikaj helpantoj, la desegnisto Jevgenij Gurov, kiu projektis en 1936 glumarkon kun la teksto „Subtenu la eldonon de Lenin-Verkaro!", la elstara poeto E. Miĥalski kaj multaj

aliaj; ankaŭ elmigrintaj esperantistoj ne eskapis: la Hungaroj József Batta kaj Ferenc Robicsek, filo de vic-popolkomisaro en la Hungara Konsilantara Respubliko de 1919.

Kiuj restis liberaj, ĉesis okupiĝi pri Esperanto, antaŭtimante la tagon, kiam la vico estos ankaŭ ĉe ili, sed aliaj naive plu praktikis la lingvon, korespondis, aŭ akceptis, ankoraŭ fine de 1937, eksterlandajn amikojn. Ĝis marto 1937 Drezen mem estis senzorge korespondinta kun Eugen Wüster pri terminologiaj demandoj; ĝuste tiutempe oni konfidis al li la ĉefan redaktadon de plurlingvaj teknikaj vortaroj. Krome dum la jaro 1937 aperis Esperantaj tradukoj de la nova Konstitucio de 1936 kaj de kelkaj verkoj de Stalin.

Ĉio ĉi montras, ke la arestojn tute ne akompanis rektaj atakoj kontraŭ Esperanto en la amaskomunikiloj (kiuj, tamen, estis plenaj de informoj pri popolaj malamikoj, eksterlandaj spionoj, publikaj procesoj kaj aliaj terurajoj) kaj ke apenaŭ regis klara konscio, ke nur la kono de Esperanto jam estas danĝera. Kiam Nikolaj Rytjkov estis arestita en marto 1938, li serioze kredis, ke oni venigas lin al Lubjanka por traduklaboroj. Sed, alveninte en tiun fifaman turmentejon, li eksciis la veran kialon. Kiel ĉiu arestita esperantisto, li aŭskultis la jenan stereotipan akuzon: „Vi estas aktiva membro de internacia spiona organizajo, kiu sin kaŝis sur la teritorio de USSR sub la nomo de Sovetrespublikara Esperantista Unio." La absurdecon de tia kulpigo ne necesas substreki.

Drezen estis mortpafita en 1937, same kelkdeko da gvidantoj. En Ĥarkov pereis en la sama jaro du bone konataj esperantistoj, V. Kolĉinskij („Elsudo") kaj V. Kuzmiĉ. Esperantistojn, kiuj estis membroj de KPSU, trafis almenaŭ eksigo el la partio, kio estis puno tre dolore sentata de multjara fidela komunisto: ĝi signifis perdon de posteno, de amikoj aŭ eĉ de parencoj. Ordinaraj membroj de SEU suferis dum deko aŭ pli da jaroj pezan punlaboron en siberiaj koncentrejoj, dividante tiun sorton kun multegaj aliaj viktimoj de la stalina teroro; el ili nur tre malmultaj revenis, el la pli konataj nur G. Demidjuk kaj P. Šumilov. Inter la funkciuloj de la postmilite renaskiĝinta Movado en Soveta Unio troviĝis nur tri iamaj ĉefaktivuloj de SEU: S. N. Podkaminer, Gurgen Sevak kaj E. A. Bokarev.

Rytjkov, nur 24-jara, kiam li estis arestita, estis liberigita en novembro 1955; li aŭdis ke li estis senkulpa, ricevis dumonatan salajron kaj senpagan unumonatan restadon en kaŭkaza sanatorio. Post jaroj da sufero aŭ timo, ne ĉiuj plene fidis la degelan veteron: Kiam eksterlandanoj malkovris en 1961 la esperantistecon de Stepan Titov, patro de la kosmonaŭto German Titov, kaj la UK en Harrogate sendis al li gratultelegramon pro la sukceso de la filo, li komence

estis grave ŝokita kaj nur iom post iom konvinkiĝis, ke fine ĉesis la periodo, kiam oni persekutas homojn pro la scio kaj uzo de Esperanto.

Rilate la nombron de la viktimoj tre diverĝas la taksoj: laŭ Rytjkov, 30.000 estis arestitaj, el kiuj la plej multaj pereis; esperantistoj en GDR foje parolis pri 2.000 mortintoj. Por ricevi bildon pri la proksimuma nombro de la perdoj, eble sufiĉas citi la lastan konatan statistikon pri la membraro de SEU. En 1935 estis 5.111 aktivaj membroj, 3.172 gejunuloj kaj 5.954 „amikoj de peresperanta korespondado".

21.4.2 Socialismo kaj Lingvo Internacia

La evoluon, kiu kondukis al la ekstermo de la Esperanto-Movado en Soveta Unio, oni povas analizi nur en la tuto de la Grandaj Purigoj resp. de la „personkulta deformiĝo" sub Stalin.

Kiam post la unuaj pezaj jaroj, post interna milito, malsato kaj eksterlanda minaco, oni povis sin plenforte dediĉi al la rekonstruo de la ekonomio, la internaciaj revoluciuloj, ligitaj kun Lenin kaj ofte devenantaj el la intelektularo, kaj la ruĝarmeaj veteranoj ŝajnis nekapablaj helpi rapidan industriigon de la lando kaj sekve estis iom post iom forpuŝitaj. Anstataŭis ilin teknokratoj, al kiuj revolucia entuziasmo kaj internaciismo estis fremdaj, kiuj malŝatis teorian diskuton, kies horizonto ne etendiĝis ekster Soveta Unio kaj kiuj konsideris Stalin sia promotoro.

Rezulte, jam fine de la 1920'aj jaroj, la interesoj de la soveta ŝtato superpezis tiujn de monda revolucio. Stalin proklamis la novan tezon „konstruo de socialismo en unu lando", donante novan interpreton ankaŭ al la nocio „monda revolucio". Se Lenin atendis tian revolucion kiel sekvon de proleta leviĝo en diversaj landoj, ĝia sorto, laŭ Stalin, dependis unuavice de la forteco de Soveta Unio, kaj la demando, ĉu iu estas internaciisto kaj revoluciulo, nun dependis de lia preteco submeti sin senkondiĉe al la gvidlinioj de Soveta Unio kaj batali senŝancele por ilia realigo; kiu pretendis defendi la internacian revolucian movadon, ne defendante Sovetan Union, tiu neeviteble transiris en la tendaron de la malamikoj de la revolucio.

En la kazo de SEU tiu nova situacio unue influis ĝiajn rilatojn kun SAT. Al tiu ĉi organizaĵo, kiu dankas sian komencan disfloron grandparte al sovetaj esperantistoj, sed ĉiam insistis pri la pluralismo de socialismaj skoloj, kun utiligo de Esperanto por la klasbatalo kiel unuiga elemento, SEU ne plu povis aparteni, se SAT ne cedis al la postuloj de Komintern kaj de aliaj internaciaj laboristaj unuiĝoj, fariĝintaj instrumento de la soveta eksterlanda politiko. En tiaj cir-

konstancoj la eksiĝo de SEU el SAT iĝis neevitebla, kaj la rompon plirapidigis Lanti mem per sia ĉiam pli forta pledo por sennaciismo, kiu estas, laŭ lia propra konfeso, ne harmoniigebla kun marksismo.

Sed kiam la soveta Esperanto-Movado subite malaperis en 1937/38, SEU jam estis likvidinta ĉiujn rilatojn kun SAT kaj aliaj nekomunistaj organizaĵoj, kaj oni do ne povas facile atribui la kialojn de ĝia pereo al nesufiĉa adapto al stalinismo nek al la „propra kulpo" de la gvidantoj, pri kies fideleco, eĉ troa, al la reĝimo ne ekzistas dubo. Kio, sekve, estis la teoria bazo por la subpremo?

Kiam post la milito la dissolvo de Esperanto-asocioj en la novaj socialistaj landoj de orienta Eŭropo koincidis kun la publikigo de la lingvistikaj leteroj de Stalin, multaj observantoj emis konjekti, ke simila ligiteco inter lingva politiko kaj pozicio de Esperanto havis decidan influon ankaŭ ĉe la multe pli frua silentigo de la Movado en Soveta Unio. Sed antaŭ ol ekzameni la validon de tiu supozo, necesas mallonge skizi la evoluon de la oficiala soveta doktrino pri la lingva problemo en socialismo kaj komunismo. Ni esploru ĝin laŭ la eldiroj de Stalin.

Unuafoje ektuŝante la nacian problemon, en 1913, Stalin kategorie neis, ke regas tendenco al nacieca diferenciĝo. Male, laŭ li, estas procezo de sennaciiĝo, ĉar sub socialismo falas kaj plue falos la limoj inter nacioj kaj lingvoj.

Aliflanke, kiam li mem respondecis pri la minoritata problemo, Stalin ne deviis de la lenina gvidlinio: doni al naciaj malplimultoj kiel eble plej grandan aŭtonomion. Turnante sin kontraŭ la ideoj de Kautsky pri estonta universala lingvo, li asertis en 1925, ke en la kazo de Soveta Unio montriĝas senĉesa diferenciĝo laŭ lingvoj kaj nacioj.

La kontraŭdiro inter liaj unua kaj dua deklaroj ne restis ignorata, kaj kredeble responde al kritikantoj de tiu kontraŭdiro Stalin klopodis pravigi sian politikon, lanĉante — en 1929 — la sloganon „per multeco al uniformeco". Kiel diris Stalin, Lenin ne implicis, ke la unuiĝo de nacioj kaj lingvoj okazos antaŭ la sukcesa establiĝo de socialismo tutmonda. Fakte, nur en tiu estonta stato estos bezono de unu ĝenerala internacia lingvo apud la naciaj lingvoj, ĝis fine, en tutmonda komunisma socio, restos nur tiu komuna, „venkinta" lingvo. Se do floras minoritataj lingvoj en Soveta Unio en la nuna stadio, tio respegulas la specialajn kondiĉojn de la „konstruo de socialismo en unu lando".

Jam unu jaron poste Stalin revenis al la temo, verŝajne lige kun la pliakriĝo de naciecaj problemoj en Soveta Unio kaj eble ankaŭ por trankviligi la pli internaciistajn partianojn. Dum la 16-a Kongreso de KPSU Stalin deklaris, ke la estonta lingvo ne estos simple

unu venkinta lingvo, sed iu tute nova, kiu estiĝas per la kunfandiĝo de naciaj lingvoj. Sed li denove emfazis, kio aktuale plej gravas: „Ni, adeptoj de estonta kunfandiĝo de naciaj kulturoj en unu komunan (laŭforme kaj laŭenhave) kulturon, kun unu komuna lingvo, samtempe estas adeptoj de florado de naciaj kulturoj en nuna momento, en la periodo de proleta diktatoreco."

Per tiu ĉi elpaŝo Stalin alprenis pozicion preskaŭ identan kun tiu de la lingvisto Nikolaj Jakovleviĉ Marr (1865-1934). La originaleco de la „jafetida teorio" de Marr troviĝas en tio, ke ĝi neas evoluon de unu pralingvo al la nuna multlingveco, asertante ke efektive okazas asimiliĝo de amaso da primitivaj familiaj kaj tribaj dialektoj al ĉiam pli grandaj lingvounuoj. Tiun asimiliĝon akcelas la kreo de ekonomiaj kaj politikaj centroj, kaj je la fino, en mondo komunisma, estos nur unu sola lingvo. Kvankam la teorioj de Marr apenaŭ estas marksismaj, li sukcesis pro la ĝenerala deziro forigi la burĝan lingvosciencon. Ĉar Marr akcentis la artefaritan originon de ĉiu lingvo kaj asertis, ke la „estonta sola universala lingvo estos lingvo de nova sistemo, aparta, ĝis nun ne ekzistinta", komprenante ĝin nepre kiel „artefarite kreotan lingvon", kelkaj sovetaj esperantologoj kredis, ke „al neniu pli multe ol al la esperantistoj povas utili la jafetida teorio" (Andreev). Tiun optimismon akcelis Marr mem, kiam li skribis antaŭparolon por la kvara ruslingva eldono de la verko de Drezen, *Historio de la Mondlingvo* (1928); lingvoj, kiel Esperanto, „akcelas amasigon de materialo por vera kreado de la sola tuthomara lingvo". Sed preskaŭ samtempe alia esperantologo, E. F. Spiridoviĉ, plendis, ke la „helpa lingvo internacia" restas ignorata de la reganta lingvoscienco, citante eldiron de Marr, ke Esperanto estas ne pli ol „surogato"; similan juĝon poste menciis ankaŭ N. V. Nekrasov.

Efektive, Marr neniam konkretigis kiel atingi tiun universalan lingvon de la futuro, radikale diferencan de ĉiuj ĝisnunaj lingvoj, kiun eĉ postrestos la buŝa lingvo, „kiu finfine estas ligita kun naturaj normoj."

Ĉiuokaze, la esperantistoj konsciis, ke nek lingvistoj nek politikistoj fervoris identigi la nunan Esperanton kun la estonta mondlingvo de senklasa socio. Sed ili senlace varbis por sia tezo, ke necesas subteni Esperanton kiel la kernon de tiu formiĝonta internacia lingvo, kvankam ili komprenis, ke tian oficialan apogon por la Esperanto-Movado malhelpas „la nunaj politikaj cirkonstancoj, kiuj ne ebligas libere okupiĝi pri niaj ideologiaj 'superkonstruaĵoj' ". Aldone al tio, tiu parto de la deklaro de Stalin, en kiu li tiel forte substrekis la nuntempajn prioritatojn en la lingva politiko, klare indikis al la esperantistoj, ke tro energia disvastigo kaj uzo de Esperanto interne de Soveta Unio povus esti konsiderata kiel provo anticipe rapidigi

ion, kio, laŭ Stalin kaj kredeble ankaŭ Marr, estis efektive rezervota al malproksima estonteco.

Drezen pro tio avertis, ke „pretendi, ke jam nun Esperanto, en siaj nunaj formoj, estas la estonta universala lingvo — estas nek sa̧ge nek konforme al la sociologio", dume esprimante la esperon, ke Esperanto, konstante „pliriĉi̧gante kaj ensorbante ĉiujn valorajn elementojn el la pluen evoluintaj lingvoj naciaj", iom post iom fari̧gos la internacia lingvo de la homaro. Sed ankaŭ Drezen ne precizigis, kiamaniere tiu revo reali̧gu. Jam pli frue akirinte la kapablon lerte akomodi̧gi al la aktuala ŝtata-partia politiko, Drezen substrekis, ke nuntempe „ni ne rajtas esti malamikaj al la plua disvolvo kaj kreskado de la lingvoj naciaj".

Ĉar Drezen rimarkis kontraŭdirojn inter la lingvistika teorio de Marr kaj la praktika formi̧go de tutsoveta patriotismo kaj eble ankaŭ ĉar lin seniluziigis la nesufiĉa komprenemo de Marr por internacia helplingvo, li volonte kaptis ŝancon por distanci̧gi de la jafetida skolo. En 1930/31 li ali̧gis al grupo de „marks-leninistaj lingvistoj" (*Jazykfront* = Lingva Fronto), kiu, kontraŭbatalante la disi̧gon de revolucia praktiko kaj „mekanikisma jafetida teorio", vidis en la teorioj de Marr baron kontraŭ vera marks-leninisma lingvistiko.

„Tezoj pri Internacia Lingvo" de la Lingvoscienca Instituto en Moskvo, aperigitaj en 1931, ŝajnis al SEU notinda provo de lingvistika flanko starigi la problemon ne nur de lingvo universala, sed ankaŭ tiun de helpa lingvo internacia. La Tezoj atakis la provojn de iuj lingvistoj (Marr?) „prezenti Esperanton kiel mortenaskitan produkton, ekskluzive kiel etburĝan utopion, kiu elvaporiĝos kune kun la likvido de la ĝin naskintaj kontraŭdikciaj kondiĉoj de la burĝa socio", sed aliflanke inkluzivis en sian kritikon kontraŭ Marr ankaŭ gravan reprezentanton de la soveta esperantologio: Spiridoviĉ, riproĉante al ambaŭ, mekanikistoj kaj formalistoj, ke ili neglektas la problemojn de la transira epoko, „kiam ĉiuj niaj fortoj devas esti uzitaj por helpo al 'plena ekfloro de naciaj lingvoj, naciaj laŭ-forme kaj socialismaj laŭ-enhave' ". La uzadon de Esperanto kiel nuran ilon de interkomunikado la Tezoj kondamnis kiel „senprincipan sekan aferistecon", ĉar ĝi neas la superstrukturan karakteron de la lingvo. La sovetaj esperantistoj devas „pliintensigi la laboron en la klasa diferencigo de esperantista movado, kiel ekstere, tiel same ankaŭ interne de USSR" kaj utiligi Esperanton „por intensigo kaj firmigo de internaciaj rilatoj de la revolucia proletaro", tamen nepre atentante, ke la proleta Esperanto-Movado estu subordigita al la taskoj de la internacia laborista movado. Kvankam la ekzisto de unu helpa internacia lingvo ne estas utopio, „ĉiuj provoj, starigi la demandon pri la komun-universala lingvo nunmomente kiel vican aktualan taskon,

estas antaŭtempaj kaj tial utopiaj", kaj pro tio, same kiel la aserto de Marr, ke la „baza problemo de lingvistiko — estas problemo de lingvo-deveno", kritikenda estas la „maldekstruma" formulo de Spiridoviĉ, ke la „baza problemo de lingvistiko estas la konstruo de la estonta lingvo."

Drezen mem subtenis tiujn Tezojn, kiujn eble li eĉ helpis kompili, kaj la Centra Komitato de SEU konstatis, ke ili koincidas kun la agadprincipoj de la soveta Movado. Probable Drezen celis per kunlaboro kun tiu grupo de kontraŭuloj de Marr krei novan teorian bazon por Esperanto sub la kondiĉoj de socialismo en unu lando. Ĝis kia grado li povis kalkuli pri la subteno de siaj kolegoj, estas neklare, sed almenaŭ Spiridoviĉ rifuzis kunkanti la ĥoron de aprobo. Kvankam ankaŭ li ne tute samopiniis kun Marr, li tamen nomis kiel ties meriton, ke li montris la vojon de konscia lingvokreado. Al la aŭtoroj de la Tezoj, kontraŭe, li riproĉis, ke ili „forĵetas flanken la koncepton pri la fundamenta tasko, de marks-leninisma lingvoscienco — batalo por konstruado de unueca lingvo de komunisma socio", konsideras la transiran periodon *„ne kiel etapon dum konstruado de komunismo* sed kvazaŭ ion memsufiĉan" kaj forgesas, ke la epoko de „plena ekfloro de naciaj lingvoj" estas „necesa ŝtupo por konstruado de la estonta mondlingvo": „Forgesi pri tio — signifas nutri la naciismon!" Estante skeptika pri la tendenco, reprezenta por Drezen, ĉiam pli minimumigi la aktualan rolon de Esperanto, Spridoviĉ timis, ke pro la bezonoj de la nuntempo oni malzorgos labori por la celata por estonteco internacia solvo de la lingva problemo, kaj insiste rememorigis pri tiu definitiva celo. Esperanto, laŭ li, ne kontraŭas la floradon de nacioj, sed ĝuste per kreado de naciaj literaturaj lingvoj kaj de helpa lingvo internacia en la transira epoko oni helpu krei tutmondan lingvon por komunisma socio.

Spiridoviĉ, do, kritikis tiun formon de „socialismo en unu lando", kiu manifestiĝis sur la kampo lingvistika. Ĉu sekve ni vidu en lia kuraĝa defendo de la proleta internaciismo unu faktoron, kiu ekigis la persekutojn? Tio estas dubinda: ĉar post ioma tempo de vigla diskutado pri la jafetida teorio Stalin decidiĝis — por Marr. La „revoluciaj lingvistoj" devis silenti, kaj Marr estis konfirmita mallonge antaŭ sia morto (en 1934) kiel nekontestata papo de la oficiala soveta lingvistiko.

Prezentiĝis paradoksa situacio: Drezen, la malnova adepto de Marr, estis malpravigita, vane, ĉar tro frue, klopodante akordigi la interlingvistikan teorion kun la nepretervidebla prefero de la oficialaj instancoj fortikigi la sovetan ŝtaton, kaj Spiridoviĉ, kiu avertis kontraŭ tia troa „aktualismo", kontentis, almenaŭ en tiu stadio, ĉar Stalin ankoraŭ ne decidis, ke estas tempo por ĉenove adapti la oficialan

pensadon al la establita praktiko.

Plue validis la stalina interpreto de la lingva problemo de 1930, kiu teorie restis por la esperantistoj la plej avantaĝa el ĉiuj deklaroj de Stalin pri tiu temaro. Ke malgraŭ tio ili implikiĝis en ardaj diskutoj pri la aplikeblo de la eldiroj de Stalin, indikas ilian konscion pri la forta malharmonio inter la oficiala teorio, kiu estis heredaĵo de la internaciisma fazo de Soveta Unio, kaj la praktika linio rezigni la revon pri baldaŭa mondrevolucio kaj sin tute koncentri al la transira periodo.

Ne estas pruveble, ĉu la persekutoj originis en tiuj viglaj lingvistikaj diskutoj. Partianeco por Marr evidente ne montriĝis danĝera, sed ankaŭ la dumtempa alianciĝo de Drezen kun la disbatita grupo almenaŭ ne tuj sekvigis paŝojn kontraŭ la soveta Esperanto-Movado. Pri atakoj kontraŭ devia sinteno de SEU flanke de la aŭtoritatoj nenio estas konata, dum la sola kritiko kontraŭ certaj aspektoj de la Movado venis ĝuste de tiuj, kiuj estis purigitaj pli frue ol la esperantistoj: jam antaŭ ol aktiviĝis *Jazykfront*, en junio 1930 la ukrajna Popolkomisaro de Popolklerigo, N. A. Skrypnik, akuzis la esperantistojn „pri la celado krei apartan sennacian popolon kun aparta sennacia kulturo kaj ideologio, substituante per ĉio ĉi la celadon de apartaj nacioj konstrui siajn proprajn naciajn kulturojn" [5] — kion oni povus interpreti kiel implicitan atakon kontraŭ la grandrusa naciismo, ĉar tri jarojn poste Skrypnik mortigis sin proteste kontraŭ la subpremo de nerusaj nacioj en USSR.

Kaj argumento, kiu povus esti poste elfosita por raciigi la persekutojn, ne estis la produkto de la stalina terorismo, sed naskiĝis inter la esperantistoj mem. Aplaŭdante al la postulo de la Tezoj uzi Esperanton por internaciaj kontaktoj de proletoj, la redakcio de *La Nova Etapo* komentis, ke tiu celdifino „devigas tamen nin elmontri precipan singardemon ĉe utiligo de la lingva heredaĵo de Esperanto, kiomgrade Esperanto estas tamen produkto de la eŭropa burĝa kapitalisma kulturo". De tia aserto ne estis longa vojo por veni al la konkludo, ke ĉiuj uzantoj de la Internacia Lingvo estas danĝeraj burĝaj kaj kosmopolitaj elementoj.

La persona opinio de Stalin pri Esperanto, kontraŭe, ne estas konata. Se sovetaj esperantistoj de tempo al tempo asertis, ke li subtenas ilian Movadon, tio almenaŭ supozigas, ke ili ne konsciis pri ia negativa sinteno de Stalin. Laŭ ne tute fidindaj informoj, li, estante prizonulo de la cara reĝimo, senemocie studis lernolibron de Esperanto, dum liaj samsortanoj estis mortpafataj kaj Trockij foje

5. Skrypnik poste tamen rekonis Esperanton kiel „unu el helpaj interproksimigiloj" kaj alvokis la proletajn esperantistojn esti antaŭ ĉio aktivaj batalantoj por realigo de marks-leninisma nacipolitiko.

malŝate notis, ke Stalin ne kapablas lerni lingvojn kaj estas diligenta nur en la facile lernebla Esperanto.

Same, ni ne povas konstati, ĝis kia grado la pozicio, ĉu pozitiva aŭ negativa, de Marr rilate al Esperanto influis la reĝimon. Sed ŝajnas, ke liaj disĉiploj, post la morto de Marr, ignoris Esperanton kaj preterlasis atribui al ĝi ian lingvorevolucian signifon. Sciante malantaŭ si la plenan apogon de la reĝimo, la marristoj denuncis ĉiun, kiu kontestis ilian monopolon en la soveta lingvistiko; kiuj ne akordiĝis, al tiuj restis nur unu alternativo: aŭ silento aŭ persekutoj. La brila lingvisto E. D. Polivanov, ekz., kiu delonge forte kritikis la teoriojn de Marr, estis arestita en marto 1937 kaj mortis en januaro 1938, kaj ankaŭ iamaj membroj de *Jazykfront* estis akuzitaj kiel spionoj kaj trockistoj. Sed ĉu Drezen troviĝis inter ili — ankaŭ tio restas nura supozo.

Ne estas kontesteble, ke la persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo kaj kontraŭ naciaj minoritatoj okazis en periodo, kiam absolute regis tiu lingvistika skolo, kies patro estis Marr. Sed konsideri lin teoriisto kaj apologiisto de tiu subprema politiko, al kiu transiris Stalin malgraŭ siaj internaciismaj deklaroj de 1930, certe estus distordo de lia pozicio. Marr ĉiam forte oponis imperiismon, inkl. la rusan; la rolon de naciaj malplimultoj en la monda historio li kelkfoje eĉ emis troige prezenti, kaj, ne forgesende, li emfaze diris, ke la universala lingvo de l'estonteco ne povos esti iu nacia lingvo, tiom malpli „unu el la multe disvastigitaj mondlingvoj".

Tuja sekvo de la lingvistika disputo por la soveta Esperanto-Movado estis eble nur, ke de tiam la esperantistoj komprenis, sur kia varmega tereno ili moviĝas, partoprenante en diskutoj pri la formo kaj enhavo de estonta universala lingvo. Post 1932 aperis neniu signifa esperantologia studo en Soveta Unio[6]; Drezen dediĉis sin unuavice al studoj pri la internaciiĝo de la terminologio en naciaj lingvoj, kaj Esperanto efektive estis reduktita al tiu tre modesta rolo, kiun Drezen avizis jam en 1931: „Ni ne intencas konsideri la nunan Esperanton, kiel plej perfektan lingvon. Ni volonte lasas al Esperanto modestan servan rolon por internaciaj rilatoj."

La perado kaj kontrolado de korespondo inter sovetaj kaj alilandaj proletoj, krom la individua pli kaj pli kolektiva, estis la ĉefa aktiveco, per kiu SEU vivtenis sin. Laŭ ĝiaj direktivoj, sovetaj esperantistoj skribis stereotipajn leterojn al eksterlando por informi siajn samklasanojn en kapitalismaj landoj pri la konstruado de socialismo en Soveta Unio, sed difinita elemento de spontano ĉiam

6. Escepto estas ŝajne nur la ruslingva *Metodiko de l' Esperanto-Instruado* (1935), studo de G. M. Filipov, kiu traktas Esperanton i.a. kiel preparan ŝtupon por lernado de fremdaj lingvoj.

konserviĝis en tiu korespondado, ĉar la leteramikoj ne limigis sin al reciproka entuziasmigado: Sovetunianoj menciis la krudajn neperfektaĵojn de sia prolet-kamparana ŝtato, dum eksterlandanoj donis nefiltritan priskribon de la vivkondiĉoj en siaj landoj, kiu ne multe taŭgis por apogi la propagandan tezon, ke kapitalismo staras sur la sojlo de kolapso. Kelkaj sovetaj esperantistoj eĉ tute senkaŝe skribis pri la stalinismaj ekscesoj en leteroj al siaj korespondantoj en eksterlando. Kiam tiaj sciigoj atingis konvinkitajn komunistojn, ili — opiniante, ke tiele nur povas skribi „kontraŭrevoluciuloj" — resendis la leteron „informcele" al SEU, kiu siavice transdonis ĝin, laŭdire, al la ŝtata polico.

Ĉiuokaze, ĝuste tiu fakto, ke Esperanto servis ne nur kiel unudirekta kanalo de informoj *el* Soveta Unio, plej kredeble kaŭzis la subpremon de la lingvo en la uragano de la Granda Purigo.

21.4.3 Esperantistoj en la Granda Purigo

En unu el la kategorioj, kiujn disbati celis la Granda Purigo vastskale lanĉita en marto 1937, troviĝis la esperantistoj. Speciala departemento de la Ministerio pri Internaj Aferoj, la misfama NKVD, havis listojn, en kiuj suspektindaj personoj estis grupigitaj laŭ la jenaj kategorioj:

AS = kontraŭsovetaj elementoj.
Ts = aktivaj membroj de eklezio.
S = membroj de religia sekto.
P = ribeluloj — ĉiu, kiu en pasinteco estis iel implikita en kontraŭsoveta agado.
SI = civitanoj kun kontaktoj al eksterlando.


Ke la esperantistoj troviĝis en tiu lasta kategorio, supozigas la aserto de la aŭstra komunisto Alex Weissberg, viktimo de la Purigo:

> Estis Stalin mem, kiu donis al Jeĵov (ĉefo de NKVD) siajn instrukciojn por la Granda Purigo. Estis Stalin mem, kiu indikis la grupojn, kiujn necesas detrui:
> .....
> (5) Ĉiuj, kiuj vivis en eksterlando kaj konis proprasperte la antaŭmilitan periodon, kaj ĉiuj, kiuj havis amikojn kaj parencojn en eksterlando kaj korespondis kun ili; la poŝtmark-kolektantoj kaj la esperantistoj.

Weissberg ne indikis sian fonton, sed tre simila kategoriigo aperas en la solaj dokumentoj de NKVD, kiujn ni disponas. Ili estis kaptitaj de germanaj trupoj dum la okupo de Litovio, poste falis



La plejado de sovetaj esperantistoj, kiun voris la Granda Purigo de Stalin (de maldekstre): Demidjuk, Drezen, Snejko (en la supra vico), Nekrasov, Varankin kaj Spiridoviĉ (en la suba vico).



Reklamilo pri 16-voluma verkaro de Lenin: Pro la persekutoj unue en Germanio, kaj poste en Soveta Unio, la plano neniam efektiviĝis.

en la manojn de usonanoj kaj estas nun konsulteblaj sur mikrofilmo en *Public Library* de Novjorko. Temas pri sekretaj instrukcioj en ligo kun la apartenigo de la baltaj ŝtatoj al USSR en 1939.

Plenumante Ordonon n-ro 001223 de NKVD de USSR de la 11-a de oktobro 1939, la Popola Komisaro pri Internaj Aferoj de Litova SSR, Guzevičius, postulis, per „strikte sekreta" Ordono n-ro 0054 de la 28-a de novembro 1940, registri — pro la „granda infektiĝo" de Litovio per ili — ĉiujn „kontraŭsovetajn kaj socie fremdajn elementojn". Li nomis entute 14 kategoriojn, i.a.

> j) Personoj, kiuj havas personajn kontaktojn kaj korespondadon kun eksterlando, kun eksterlandaj legacioj kaj konsulejoj, esperantistoj kaj filatelistoj.

Tiu registrado devis esti finita sur provinca nivelo ĝis la 10-a de februaro 1941 — kiel vidiĝas el instrukcio de la NKVD-ĉefo en Biržai de la 30-a de januaro, cetere relistiganta la diversajn kategoriojn.

La taskon forigi la „kontraŭsovetajn elementojn" el la baltaj respublikoj al malproksimaj regionoj de Soveta Unio ricevis la vicĉefo de la soveta NKVD, Ivan Serov. La deportado komenciĝis la 6-an de junio 1941, atingis sian kulminon en la nokto inter la 13-a kaj 14-a de junio kaj estis interrompita pro la germana invado, la 21-an de junio. Poste la nazioj daŭrigis la laboron laŭ sia maniero, kaŭzante grandajn perdojn precipe al la estona Movado; mortigitaj estis i.a. Helmi Dresen, la ŝatata poetino, kaj Neeme Ruus, Ministro pri Sociaj Aferoj de Estona SSR[7].

Ĉar „socie fremdajn elementojn" ne toleratajn en la baltaj landoj oni evidente ne toleris, kaj pli frue forigis, en Soveta Unio mem, la grupigo de Weissberg verŝajne posedas altgradan aŭtentikecon, ne nur pro la simileco kun la litovaj dokumentoj, sed ankaŭ pro du aliaj kongruaĵoj. La nomo de Jeĵov menciiĝis lige kun Esperanto ankaŭ en alia loko; ĉ. 1934/35 Incertov skribis al sia japana kamarado Kurisu, ke Jeĵov komencis esplori la situacion de Esperanto en Soveta Unio, — sed Incertov esperis evidente, ke post la interveno de Jeĵov malaperos malfacilaĵoj, ekz. manko de papero por Esperantaj eldonaĵoj, kaj ke eble li rehavigos al SEU tiun oficialan apogon, kiun ĝi longe ĝuis. Jen tio denove montras, kiom la esperantistoj fidis al la reĝimo, kia terura ŝoko estis por ili la aresta ordono. Kaj, kiel memoras Rytjkov, kiam SEU estis disbatata, la sama sorto trafis ankaŭ la filatelistojn....

7. Laŭdire, en la sovet-estona parlamento 15% estis esperantistoj, i.a. la nova ĉefministro J. J. Vares-Barbarus (kiu sin mortigis en 1946).

21.4 "LINGVO DE CIONISTOJ KAJ KOSMOPOLITOJ"

Spite ĉiujn teoriajn eldirojn pri la proleta internaciismo, la stalina reĝimo decidis malebligi la rektan interŝanĝon de ideoj inter sovetaj kaj alilandaj laboristoj. La internacia ideologio de la bolŝevika revolucio, tiu „ekstreme favora bazo por progresigo de la Esperanto-Movado" (Drezen), kiu same favoris egalrajtan disfloron de naciaj lingvoj kaj kulturoj, devis cedi sian lokon al hegemonia pozicio de la rusa lingvo kaj de perrusa soveta kulturo. Stalin nun ĉesis toleri liberan evoluon de lingvoj kaj nacioj dum la transira periodo, forĝante la karakterizaĵojn de tutsoveta patriotismo, kaj „forgesis" la ĉefan postulon de Lenin, ke la kunfandiĝo de la nacioj devas okazi libervole, ke estas nepacigebla konflikto inter socialismo kaj nacia subpremo kaj ke neniu lingvo havu ian privilegion. La gvidlinion de Lenin, ke la rusa ŝovinismo plej multe minacas la venkon de komunismo, Stalin renversis en la dua duono de la 1930'aj jaroj, traktante la naciajn malplimultojn kiel ĉefan danĝeron. Stalin altrudis la rusan al la minoritatoj kaj malpermesis kulturan kunfandiĝon de parencaj popoloj: la eksperimento de artefarita ĥalka-burjata lingvo estis ĉesigita, aliaj lingvoj devis transiri al cirila alfabeto aŭ pleniĝadis de rusaj vortoj, la parolantoj de Esperanto malaperis, kaj la kulmino de tiu evoluo estis registara dekreto, kiu deklaris la rusan lingvon deviga fako en la lernejoj de naciaj minoritatoj — la 13-an de marto 1938, la saman tagon, kiam Buĥarin kaj Rykov estis kondamnitaj al morto. Okazis precize tio, kion Spiridoviĉ jam en 1930 time antaŭsentis: se la Esperanto-Movado ne povas progresi sur la bazo de la plej larĝa disvolviĝo de naciaj kulturoj kaj lingvoj, tiam minacus „asimiliĝo de la nacioj kaj sekve ankaŭ de iliaj lingvoj el la flanko de pli potencaj nacioj" kaj „tiam malnecesiĝus la bezono pri internacia helpa lingvo".

La esperantistoj, kiuj fieris esti avangarda trupo en la formiĝprocezo de tutmonda komunismo, kiuj nelacigeble penadis varbi por la modelaj akiraĵoj de Soveta Unio, kiuj fidoplene registris la profetaĵojn de Stalin pri kunfandiĝo de nacioj, kiuj ankoraŭ salutis Jeĵov, kvazaŭ savanton: ili fine estis senprepare, sendiskute, silente forbalaitaj, sen ia jura bazo kaj sen la povo defendi sin kontraŭ konkretaj akuzoj simple deportitaj al neniigejoj, se ne tuj mortigitaj, kune kun senideologiaj „etburĝoj", kiuj korespondis kun eksterlando, parencoj de elmigrintoj aŭ ŝatantoj de tia sendanĝera hobio, kia estas la kolektado de poŝtmarkoj. La grandaj cerbostreĉoj, per kiuj Drezen kaj aliaj provis meti Esperanton en la servon de proleta internaciismo, ne alportis al la esperantistoj ian privilegian traktadon, kiam Stalin decidis entrepreni la Grandan Purigon kontraŭ ĉiuj „malamikoj de la ŝtato".

Dum dudek jaroj aperis nenia Esperanta presaĵo en Soveta Unio;

nur en 1954-55 paŝon post paŝo restariĝis la Movado. Sed ne pli frue ol en 1963, en Sofio, sekve de insista peto de la Bulgaroj al la CK de KPSU, delegacio de sovetaj esperantistoj denove partoprenis internacian Esperanto-kongreson — por la unua fojo post 1931.

Drezen estis verŝajne rehonorigita dum la epoko de Ĥruŝĉov — dokumento de Instituto pri Marksismo-Leninismo en Moskvo parolis pri „*kamarado* Drezen", sed publika deklaro, ke la detruo de SEU kaj la persekutoj kontraŭ miloj da esperantistoj baziĝis sur falsaj akuzoj, ne estis ĝis nun disvastigita.

21.4.4 Granda Silento en Orienta Eŭropo

La Esperanta printempo en la orienteŭropaj ŝtatoj, liberigitaj el sub faŝisma jugo, daŭris nur dum malmultaj jaroj. La unuarangeco de socialisma konstruado, la Malvarma Milito, la kreskanta influo de la soveta personkulto, la histeria ĉasado de „titoistaj agentoj" kaj, ne malplej grave, la kampanjo kontraŭ kosmopolitismo kaj cionismo (!) — ĉio kaŭzis, ke ankaŭ la Esperanto-Movado devis unue submetiĝi kaj fine silenti.

Kiel unua, la soveta zono de Germanio entreprenis paŝojn por malhelpi reorganiziĝon de la Esperanto-Movado. La malpermeso venis en formo de dekreto de la Administracio pri Internaj Aferoj, la 12-an de januaro 1949; en la direktivoj por plenumo de la dekreto, la artikoloj 7 kaj 8 ordonis malfondon de Esperanto-grupoj kaj tujan ĉesigon de la Esperanto-rubrikoj en la gazetaro. Per letero de la 24-a de januaro 1949 la saksa Ministerio pri Popolklerigo motivis la decidon jene:

> Ĉar Esperanto ne estas natura lingvo, kreskinta kun iu popolo, oni ne povas konsideri tiun artefaritan lingvon taŭga rimedo por interproksimigi la kulturajn valorojn de la popoloj, des malpli ĉar la koncerna literaturo estas multe trapenetrita per reakciaj tendencoj. Ni rekomendas al vi meti vian grupon en la servon al la dujara plano kaj direkti viajn filologiajn interesojn al mondlingvo, kiu akcelas nian konstrulaboron multe pli ol la eksperimentoj de lingva sintezo.

Ne necesas fantazio por kompreni, ke la pli grava mondlingvo estas la rusa.

La situacio ne ŝanĝiĝis per la fondo de Germana Demokratia Respubliko. Male, la nova registaro precizigis en letero de la 4-a de novembro 1949 al Unuiĝo de Persekutitoj de la Nazia Reĝimo: „Estas fakto, ke kontraŭuloj de nia demokratio provas ĝeni niajn laborojn per helpo de Esperanto-grupoj. Per gazetoj aperantaj eksterlande kaj per tiel nomata internacia societo kun sidejo en

21.4 "LINGVO DE CIONISTOJ KAJ KOSMOPOLITOJ"

München (= Germana Esperanto-Asocio) oni provas sub preteksto de kultura neceso gajni anojn, per kies helpo oni volas malbonfamigi nian demokratan ordon." Aliaj oficialaj instancoj asertis: „Esperanto ja ne havas propran gramatikon, pro tio ĝi ja ne estas lingvo."

Dume, ankaŭ en Pollando, kies ĉefministro Cyrankiewicz antaŭ nelonge estis subskribinta peticion al UN favore al Esperanto, la atmosfero fariĝis ĉiam pli malfavora. La 4-a postmilita Pola Esperanto-Kongreso, okazonta en aŭtuno 1949 en Varsovio, lastmomente ne povis okazi, kaj la jam kompostita numero de *Pola Esperantisto* ne povis aperi. Kvankam Asocio de Esperantistoj en Pollando neniam estis formale malpermesita, tamen ĉiam pli estis limigita ĝia agado; el tridek filioj restis nur du, kiuj kune kun kelkaj individuoj grupiĝis ĉirkaŭ la Ĉefa Estraro. Multobligitaj informiloj povis, sen permeso, aperi, sed eĉ presigi pagitajn anoncetojn por koresponda kurso ne estis eble.

Tamen, la Hungaroj havis kialojn por envii la Polojn. Ankoraŭ en printempo 1948 pli ol cent parlamentanoj subtenis pli vastan instruadon de Esperanto — nur du jarojn poste jam neniu Esperanta gazeto plu aperis en Hungario. La tradiciriĉa *Literatura Mondo* ĉesis ekzisti post sia julia/aŭgusta numero en 1949, oficiale „pro financaj malhelpoj". Kaj la 6-an de aprilo 1950 komitatkunsido de Hungarlanda Esperanto-Societo voĉdonis, ke „la Esperanto-Societo provizore interrompu sian agadon."

Plej longe rezistis subpremon la Ĉeĥoslovakoj. Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko (EAĈSR) havis komence de 1949 3.020 membrojn. Ĝia prezidanto Malík partoprenis la UK en Bournemouth kiel oficiala delegito de la Ministerio de Informado, kiam Bulgaroj, Hungaroj kaj Rumanoj jam ne plu estis reprezentitaj — pro „tro severaj reguloj" de siaj registaroj, kiel plendis la organo de EAĈSR. La Ministerio ankaŭ subtenis la eldonadon de informa bulteno, *Esperanto-Servo,* dissendita en kelkmil ekzempleroj al eksterlando; gazetoj ofte presis artikolojn tradukitajn el Esperanto; aperadis la altnivelaj revuoj *Esperantista* kaj *Esperantisto Slovaka;* aŭtoritatuloj salutis la 8-an Kongreson de EAĈSR fine de majo 1950 (kun preskaŭ 1.000 partoprenantoj); kaj la nombro de lokaj grupoj eĉ kreskis — de ĉ. 80 en 1949 al 94 en 1950. Sed en la lastaj monatoj de 1950 multiĝis malfacilaĵoj ankaŭ por la ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Dum la UK en Parizo mankis delegacio el ĈSR, la populara „Verda Stacio" ĉesis elsendi meze de septembro, kaj fine de la jaro EAĈSR sentis sin devigita eksiĝi el UEA, ĉar ĝi estis „tro videble influata de reakcia politiko imperiista kaj de Tito-ismo". Serĉante liberigi la Asocion „el sub la suspekto, ke en nia ekzistanta popoldemokrata sistemo ĝi volas resti movado kosmopolita", Malík pro-

ponis, sub la devizo „Sur novan vojon!", fondi „internacian Ligon de progresemaj esperantistoj, kiuj laborus en spirito de proleta internaciismo".

Sed jam en junio 1951 EAĈSR konfesis, ke tiu „ILPE" estas mortnaskita infano, ĉar eksterlandaj „progresemaj" esperantistoj aŭ ne plu povis aŭdigi sin aŭ estis nombre tro malfortaj por certigi realigon de la plano. Dume, oni esperis, ke eble tia Ligo estos starigita — en Ĉinio, kie en marto 1951 naskiĝis Ĉina Esperanto-Ligo.

Raporto pri la Asocia Tago en Prago (17-6-1951) montris regreson de la Movado, sed ankoraŭ ne senesperan situacion. Pluraj lokaj grupoj jam dissolviĝis kaj aliĝis al la Kulturaj Kluboj de Revolucia Sindikata Movado, artikoloj de la Gazetara Servo ne estis presataj, okazis malpermesoj vendi lernolibrojn; sed aliflanke oni menciis leteron de la Komunista Partio, en kiu estis rekomendite „ke ni daŭrigu nian sukcesan laboron laŭ la ĝisnuna maniero".

Tamen, en decembro 1951 ĉesis aperi la du organoj, ĉar la Ministerio de Informado „reorganizis planon de eldonado de gazetoj", kaj fine, laŭ konsilo de la Ministerio de Internaj Aferoj, EAĈSR likvidiĝis „libervole", la 6-an de septembro 1952, per decido de la Asocia Komitato.

Sed kelkaj kuraĝuloj zorgis, ke, malgraŭ gravaj obstakloj, la Movado en Ĉeĥoslovakio povis sekurigi iom da kontinueco. Agema junularo en la regiono de Ostrava regule organizis somerajn tendarojn por junaj esperantistoj; aliaj organizis ekspoziciojn de materialoj akiritaj per Esperanto, ekz. pri strikoj en okcidento, aŭ monkolektojn por „pacdefendantoj en kapitalistaj landoj". La revuo *El Popola Ĉinio* havis inter ĉeĥoslovakaj esperantistoj ankoraŭ en 1953 ĉ. 1.000 abonantojn, kiuj restis fidelaj, eĉ kiam duobliĝis la abonprezo post transpreno de ĝia distribuo fare de ŝtata entrepreno. Sed baldaŭ „ia miopa interveno kaŭzis la ĉesigon de la sendado al nia lando". Fine de tiu jaro ĉesis aperi EPĈ, verŝajne malpli pro adaptiĝemo al la politika linio en orienta Eŭropo, ol pro tiu subita perdo de milo da legantoj. Intertempe Rudolf Burda en Plzeň lanĉis stencilitan bultenon *La Pacdefendanto*, kiu rapide akiris pli ol 1.000 legantojn kaj baldaŭ, same kiel la ĉeĥoslovakaj numeroj de *Paco*, plenumis gravan funkcion por rompi la glacion en la popoldemokratioj rilate al Esperanto.

En la plej multaj orienteŭropaj ŝtatoj, tamen, eĉ tiaj modestaj aktivadoj ne estis eblaj. Tion spertis ekz. Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, kiu ne plu povis kunlabori kun siaj multaj tre agemaj membroj tie. En raporto pri la laborjaro 1951/52 la estraro menciis, ke „ĵurnalistoj, al kiuj ni sendis TEĴA-Informilon kaj membrokarton tuj estis arestitaj".

21.4.5 Stalin kontraŭ Marr

La silentigo de la Internacia Lingvo en la popoldemokratioj ŝajnis al multaj eksterlandaj esperantistoj kaj aliaj observantoj pli facile interpretebla ol la subpremo de la Movado en Soveta Unio en 1937/38, ĉar ĉirkaŭ la sama tempo Stalin elpaŝis sur la kampo lingvistika.

De junio ĝis aŭgusto 1950 *Pravda* kaj *Bolŝevik* aperigis respondojn de Stalin al kelkaj demandoj pri la rilato inter marksismo kaj lingvoscienco. En tiuj „Lingvistikaj Leteroj" li denove akcentis, ke internacia lingvo povos estiĝi nur post la venko de socialismo en monda kadro, sed ne plu, kiel en 1930, li konsideris ĝian formiĝon rezulto de nura kunfandiĝo. Nun Stalin, revenante al siaj diroj de 1929, asertis, ke venkinta, ĉar servanta al progreso, lingvo efikas unuecige sur lingva kampo kaj kontribuos al la estonta unulingveco.

En sia letero al A. Ĥolopov, Stalin klare diferencigis inter la lingva situacio antaŭ kaj post la venko de socialismo. Sub la nunaj kondiĉoj, laŭ li, povas okazi nur lingvokruciĝoj, kiuj ne kondukas al formiĝo de unu nova lingvo, sed al la venko de unu kaj la malvenko de la alia. Poste, sub tutmonda socialismo, el centoj da naciaj lingvoj unue elstaros unuecaj „zonaj lingvoj", kiuj fine kunfandiĝos al unu komuna internacia lingvo ensorbinta „la plej bonajn elementojn de la naciaj kaj zonaj lingvoj".

Analoge al la precipeco de la konstruo de socialismo en unu lando, Soveta Unio, kaj la fortikigo de la ŝtato formortonta nur post tutmonda revolucio, sekve ankaŭ okupiĝo pri internacia lingvo *nun* estas antaŭtempa kaj neakceptebla. Por la nuntempo Stalin opiniis, ke necesas evoluigi tiun lingvon, kiu jam estas la plej progresinta, — ne lasante dubon pri tio, ke temas pri la rusa.

La Leteroj de Stalin tiutempe elvokis sensacion unuavice pro lia forta kondamno de la teorioj de N. Ja. Marr, kiuj ĝis tiam okupis unuarangan pozicion en la soveta lingvistiko. En tiu ĉi kunteksto aparte notinde estas, ke la lingvisto A. S. Ĉikobava, kiu interkonsente kun Stalin lanĉis la diskuton, nete asertis, ke la opinio de Marr „favoranta artefaritan akceladon de la kreiĝ-procezo de unu sola komuna lingvo ne povas esti rekonita kiel marks-leninista".

Observantoj en okcidento supozis, do, rektan rilaton inter la Lingvistikaj Leteroj de Stalin kaj la anatemo kontraŭ Esperanto en la landoj sub soveta influo. La deturniĝo de la internaciisma skolo de Marr malebligis, laŭ tiu vidpunkto, la pluan disvastigadon de Esperanto. Lasante flanken la fakton, ke tia argumentado (implicanta, ke Esperanto nur tiumomente iĝis neakordigebla kun la ofi-

ciala lingva politiko) evidente ne klarigas la multe pli fruajn eventojn en Soveta Unio kaj iliajn kialojn, ni esploru, ĉu ĝi kapablas adekvate komprenigi la postmilitan evoluon.

Kronologio de la eventoj montras, ke malakceptiĝo de la teorioj de Marr sekvis, kaj ne antaŭis, la malpermeson de la Esperanto-Movado en la popoldemokratioj. La orienteŭropaj esperantistoj estis jam malorganiziĝintaj aŭ antaŭsentis, ke tia sorto atendas ilin, longe antaŭ ol Stalin surprizis la publikon per sia reapero, unuafoje post 1938, sur la scenejo kiel teoriisto. Ĝenerala gvidlinio, ke Esperanto ne plu estu tolerata, estis konkrete decidita verŝajne plej malfrue en aŭtuno 1949 — pli ol duonan jaron, antaŭ ol komenciĝis la diskuto en la kolumnoj de *Pravda*. Kiam la 2-an de oktobro 1949 L. Kökény kiel kutime iris al la studio de Radio Budapeŝto, li aŭdis, ke „de hodiaŭ estas la linio" ne plu disaŭdigi Esperantajn elsendojn. Per tio komenciĝis la Granda Silento en Hungario. Kaj same subite, ankaŭ en oktobro, mutiĝis la radio-elsendoj en Pollando.

Tamen, ĉu tio okazis en la kadro de malrapida procezo celanta subpremi la marristojn kaj ĉiujn iliajn supozatajn aliancanojn? Dubinde: ĉar ĝuste tiam ĉesis mallonga periodo de iom pli libera diskutado en la soveta lingvistiko kaj de timemaj provoj eliri la rigidiĝintan framon de la jafetida teorio. Jam en oktobro 1948 la adeptoj de Marr refirmigis sian pozicion, lanĉante vastskalan atakon kontraŭ ĉiuj deviantoj, kontraŭ ĉiuj lingvistoj, kiuj estas sub influo de „reakciaj kaj idealistaj fluoj de la eksterlanda burĝa lingvistiko", kaj la 21-an de julio 1949 la Akademio de Sciencoj per oficiala deklaro konfirmis la pluan validon ekskluzivan de la teorioj de Marr. Ĉu estas nura hazardo, ke Esperanto iĝis nefavorata en la orienteŭropaj landoj ĝuste, kiam la marristoj troviĝis en simile zenita pozicio kiel en la mezo de la 1930'aj jaroj, plene ĝuante oficialan gracon kaj ĵus venkinte siajn kritikintojn? Estis unu el la gvidaj marristoj, Prof. T. Lomtev, kiu deklaris komence de 1949:

> La nuntempaj apologiistoj de la imperiismo faras vastan propagandon por la kosmopolitismo, reakcia ideologio de la imperiista burĝaro. Ili utiligas kiel ideologian armilon la ideojn de la renegato Kautsky, koncerne ultra-imperiismon, kunfandiĝon de la nacioj kaj iliaj lingvoj en la epoko de kapitalismo kaj imperiismo, kreon, en la nuna epoko, de unu sola lingvo universala.

Precize sur la sama linio moviĝis la bulgara esperantisto Atanas Lakov:

> Provo trudi Esperanton en la nuna tempo kiel universalan mondlingvon, en ĝia nuna precipe eŭropa formo, signifas perfortan likvidon

de kulturoj kaj lingvoj de ekstereŭropaj popoloj, signifas starigon de Esperanto kiel ilo de imperiisma ekspluatado.

Kio efektive validas por la nuna tempo, tion esprimis la sovetaj lingvistoj kaj antaŭ kaj post la elpaŝo de Stalin. Ekz., en sia novjara numero de 1949 *Literaturnaja Gazeta* jene karakterizis la diversajn epokojn de la historio en rilato kun ĝiaj „mondlingvoj": la rolo de mondlingvo estas asignita al la latina en la periodo de klasika historio, al la franca en la feŭda periodo, al la angla en la epoko de kapitalismo, kaj al la rusa en la granda erao de socialismo; sed ne nur en la estonta socialismo tutmonda, sed jam nun, kiel klarigis en novembro 1949 la akademiano N. T. Jakovlev: la rusa lingvo „ne estas nur la lingvo de USSR, sed ankaŭ la internacia lingvo en la popolaj demokratioj".

21.4.6 La Bezonoj de la Nuntempo

Vidi la problemon de Esperanto nur en la kadro de la disputo inter lingvistikaj skoloj facile kondukas al konfuzo kaj nebuligo de la vera politika fono, kiu kaŭzis la persekutojn kontraŭ la Internacia Lingvo. Se la Movado estis sufokita en USSR mem, evidente ĝia pluekzisto en landoj sub ties influo ne povis estis permesata, kaj ju pli klare rimarkiĝis la soveta influo en tiuj landoj, des pli baldaŭ la reĝimoj sentis la bezonon elimini ĉion, kion ili konsideris kontraŭa al la soveta modelo.

Tio klarigas, kial, ekz., en orienta Germanio, kiu tiutempe estis ankoraŭ rekte regata de la soveta milita administracio, malpermesa dekreto estis publikigita jam komence de 1949, aŭ kial Ĉinio aliĝis al tiu evoluo plej laste, nome en la fino de 1953, kiam ĉesis aperi *El Popola Ĉinio*. Kaj la orientgermana klarigo montras, ke unuaranga faktoro estis la timo de nekontroleblaj kontaktoj kun eksterlando — same kiel en 1937/38 en USSR aŭ en 1940 en la baltaj ŝtatoj. Ne fideleco al oficiala lingva doktrino, sed politikaj konsideroj, la zorgo pri interna sekureco, instigis la reĝimojn kontroli aŭ malpermesi la „kosmopolitan" movadon de la esperantistoj.

La rapidecon kaj gradon de la subpremo oni, plue, devas rilatigi al la malsamaj internaj kondiĉoj en la popoldemokratioj. En Bulgario kaj Ĉeĥoslovakio, kie estis forta antaŭmilita Movado, la esperantistoj, el kiuj pluraj troviĝis en altaj ŝtataj kaj partiaj pozicioj, plej longe kontraŭstaris la tendencon esti subite identigitaj, nur pro sia scio de Esperanto, kun cionistoj kaj kosmopolitoj, ĉar ili povis facile dokumenti sian kontraŭfaŝisman aktivadon. Similaj antaŭkondiĉoj ekzistis en Hungario, sed tie la gvidaj esperantistoj jam frue decidis dissolvi sian organizaĵon. Fine, ankaŭ la Bulgaroj kaj

Ĉeñoslovakoj devis cedi al la oficiala klarigo, ke necesas nun dediĉi sin al pli urĝaj taskoj ol flegado de internacia lingvo, ke dum konstruado de socialismo simple ne estas loko por Esperanto.

Tia argumentado troviĝas en unu tre rivela dokumento pri la situacio de Esperanto en orienta Eŭropo komence de la 50'aj jaroj: en letero de tri paĝoj, anglalingva, de la ĉeñoslovaka Ministerio de Kulturo (22-9-1953) responde al la konsternita demando de japana komunista esperantisto pri la kialoj de la likvido de Esperanto-rondoj en ĈSR. La letero eksplicite senkulpigas la ĉeñoslovakajn esperantistojn de akuzo kutima en Soveta Unio kaj orienta Germanio:

> Estas vere, ke esperantistoj en Ĉeñoslovakio pruviĝis kiel patriotoj, kiuj uzis Esperanton en progresema maniero. Ne estas unu kazo, kiam ĝi estis uzata kontraŭ la interesoj de la popolo kaj ŝtato. Tio ŝuldiĝis al la konscia patriota gvidado de la esperantistoj, kiuj montris kiel uzi Esperanton por la bono de la ŝtato. Nia popolo suferis grandegan malĝojon en sia nacia tragedio dum la hitlera okupo. La esperantistoj ne seniluziigis la nacion kaj metis sian scion de Esperanto en la servojn de la lando. Iliaj aktivadoj estis favore juĝitaj de la registaro. Iliaj modestaj klopodoj naskis bonan frukton.

Post tia laŭdo ne estas facile pravigi, kial nuntempe Esperanto ne plu povas servi al la popolo, sed per pensakrobataĵoj la Ministerio venas al la konkludo, ke nuntempe tiuj modestaj, kvankam sukcesaj, klopodoj de la esperantistoj ne povas kontentigi la grandajn taskojn difinitajn de partio kaj registaro. En 1950 estis publikigita nova leĝo pri asocioj, laŭ kiu ili devus aliĝi al unu el la grandaj amasorganizaĵoj. EAĈSR klopodis aliĝi al unu el ili, sed ĉar neniu volis ĝin akcepti, ĝi transpaŝis la fiksitan tempolimon kaj dissolviĝis. „Ne estas la kulpo de la ŝtata administracio, ke la Esperanto-Asocio haltigis siajn aktivadojn, sed la fakto, ke oni ne obeis la leĝon por nova registrado de asocioj."

Substrekinte, ke „Esperanto ne estas bezonata en la pli alta fazo de la evoluo de internaciaj rilatoj", la dokumento fine rimarkigas:

> En la kapitalistaj landoj, en la manoj de progresemaj homoj, ĝi (Esperanto) ankoraŭ havas gravan funkcion kaj devus labori man-en-mane kun la pacdefendantoj. Se tio ne okazas, tiam ĝi iĝas „kosmopolitismo por eksporto", kaj tial la ĉeñoslovaka popolo kaj ŝtato devas sin protekti pro kialoj de sia propra ekzistado.

Ke la uzado de Esperanto en kapitalistaj landoj por progresemaj celoj ne povas esti tre efika, se mankas ebleco por interkomunikiĝi kun pacdefendantoj en la socialismaj landoj, evidente estis ekster la

imagopovo de la Ministerio.

Kion signifas „pli alta fazo de la evoluo de internaciaj rilatoj"? Tion la aŭtoritatoj preferis detaligi nur en la enlanda uzo, al kiu apartenis pli sincera lingvaĵo. Unu tagon antaŭ la „memlikvidiĝo" de EAĈSR, Rudolf Burda sendis protestan leteron al la ĉefministro Antonín Zápotocký, petante klarigon, kial Esperanto — lingvo, kiun, laŭ la opinio de Burda, subtenis eĉ Lenin — nun ne plu estas tolerata. Al la respondo de la oficejo de Zápotocký (24-10-1952) oni ne povas riproĉi nesufiĉan konkretecon:

> De la tempo, kiam kamarado Lenin akcentis la signifon de Esperanto por la laborista klaso, pasis tre multa tempo. Intertempe estis konstruita la granda patrujo de socialismo, Soveta Unio, kaj la konstruado de socialismo disvastiĝis al ĉiam pli da landoj, kiuj vidas en Soveta Unio sian modelon kaj abunde ĉerpas el ĝiaj spertoj. El tiu motivo centmiloj da laboristoj en tiuj landoj, eĉ ekster ili, lernas la gepatran lingvon de la pioniroj de socialismo, la rusan. Ĉe tia amasa disvastiĝo de la rusa lingvo, malantaŭen iras nature en la fonon la signifo de Esperanto, kiu ĉiuokaze estas lingvo artefarita kaj tial eĉ ne estas lingvo en la vera senco de la vorto....
> Ni opinias, ke en la nuna tempo efektive multe pli utilas meti tiujn fortojn, organizajn rimedojn kaj energion, kiuj estas dediĉataj al Esperanto, en la servon al plia disvastigo de la scio de la rusa lingvo. Ne temas pri ia oficiala malpermeso de Esperanto, kiel vi aludas en via letero. Temas nur pri tio, ke ĉiuj kamaradoj ekkonsciu la ŝanĝiĝintan situacion kaj el ĝi rezultantan malaltiĝon de la signifo de Esperanto.

Por reveni al la Lingvistikaj Leteroj de Stalin: Ni vidis, ke en la plej multaj landoj la Esperanto-asocioj jam ĉesis funkcii, kiam komenciĝis la diskuto pri problemoj de la lingvistiko, en kies daŭro Stalin, tute neatendite, kondamnis la teoriojn de Marr. Tiu doktrina ŝanĝo ne videble rapidigis la kontraŭesperantan politikon de la orienteŭropaj partioj. Eble la esperantistoj en Bulgario kaj ĈSR dum iom da tempo eĉ supozis, ke la nova teorio alportos al Esperanto novan ekzisto-rajton; iliaj revuoj represis partojn de la lingvistika diskuto. Se SEU pereis en tempo, kiam senkonteste validis la teorioj de Marr, ne estis tute absurda la kredo, ke oni povos elsaviĝi deklarante sin viktimoj de la skolo de Marr. Baldaŭ, tamen, oni komprenis, ke la Leteroj ne signifis ion novan, sed klopodis reharmoniigi — malfrue — teorion kaj praktikon en la lingva politiko de Soveta Unio, ke Esperanto restis malŝatata kaj praktike malpermesita, ne pro la dominado de tiu aŭ alia lingvoscienco, sed pro politikaj konsideroj. Ĉiuj esperantistoj en orienta Eŭropo devis submetiĝi al la postuloj dediĉi ĉiujn siajn fortojn al konstruado de so-

cialismo, vidante ke la aŭtoritatoj nun disponis pri pli taŭga raciigo de la verdikto kontraŭ Esperanto ol estis nebulaj avertoj kontraŭ „internacia societo en Munkeno" — eĉ se nur per la argumento, ke ja mankas mencio de artefarita lingvo en la Leteroj de Stalin.

21.4.7 Reviviĝo de la Movado

La kernon de la problemaro rilata al la subpremo de Esperanto en USSR kaj en la landoj de ĝiaj aliancanoj trafis la Estraro de UEA kaj la Plenumkomitato de SAT, kiuj per komuna Nefermita Letero al Stalin (majo 1952) nete atribuis la kontraŭesperantan politikon de Soveta Unio al lingva imperiismo. Citante eldirojn de sovetaj lingvistoj, la Letero trafe atentigis pri la kontraŭdiro inter la profetaĵoj pri kunfandiĝo de lingvoj kaj nacioj, unuflanke, kaj la praktika utiligo de la rusa kiel sola internacia lingvo, aliflanke, kaj, krome, inter la neo de klasa karaktero de la lingvo kaj la implicita postulo, ke internacia lingvo devas atendi novan bazon aŭ superstrukturon por formiĝi kaj ekesti.

Ne subtaksenda estas ankaŭ la precedenca karaktero de tiu ĉi dokumento, per kiu la internacia Movado por la unua fojo oficiale forlasis la pozicion de neŭtralismo kaj senhelpa spektado, tiel ofte spertitaj, kiam Esperanto kaj ĝiaj parolantoj suferis persekutojn. Sed, se temas pri la elpaŝo de Stalin, granda signifo por Esperanto troviĝis en ankoraŭ io alia, kion tiutempe la aŭtoroj de la Letero de UEA kaj SAT apenaŭ povis antaŭvidi.

Hodiaŭ studantoj de la moderna soveta historio interkonsentas, ke eble la sola vere grava kaj sekvoriĉa eldiro en la longa, teda diskuto pri lingvistiko estas la konkludo de Stalin: ke „marksismo estas la malamiko de ĉia dogmismo". Eĉ se Stalin sin esprimis tiamaniere por havigi al si plenan liberecon de agado kaj por trovi eliron el la ĉiamaj kontraŭdiroj inter la internaciisma tradicio de socialismo kaj la praktika prefero senĉese sin apogi je la interesoj de la soveta ŝtato, tamen restas nedubeble, ke kun la deturniĝo de Marr finiĝis danĝera izoliteco de la soveta lingvistiko kaj ke la elstarigo de kontraŭdogma marksismo malrapide ebligis „senstalinismiĝon" ankaŭ sur aliaj kampoj, precipe post la morto de Stalin. Kiam la novaj gvidantoj de USSR proklamis la celon de paca kunekzistado, fine ankaŭ kontaktoj kun eksterlando, interhomaj, ne nur interŝtataj, iom post iom perdis sian tabuan karakteron.

En tiu ĉi ŝanĝo de la klimato, la esperantistoj komencis ĉerpi novan esperon. Kvankam la sinteno de la oficialaj instancoj restis nefavora, ekde 1954/55 superregis ne plu ideologiaj akuzoj kontraŭ la nefidindaj esperantistoj, sed „pragmatisma" dubo pri la kvalitoj

21.4 "LINGVO DE CIONISTOJ KAJ KOSMOPOLITOJ"

de la lingvo. La argumentoj tre similis la rezon-manieron de ekstreme konservativaj kontraŭuloj de Esperanto, sed restas kiel kuraĝiga elemento, ke oni ne plu simple prisilentis Esperanton aŭ ke la esperantistoj ne plu estis denuncataj kiel burĝaj kosmopolitoj (akuzo, kontraŭ kiu ne eblis efike sin defendi).

En aŭgusto 1954, oficiala soveta institucio rompis la silenton, rekte tuŝante la problemon de Esperanto — por la unua fojo, ŝajne, post multegaj jaroj. Responde al demando el Kanado, la vicprezidanto de la Sekcio de Pedagogiaj Sciencoj de Societo de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landaj, V. Esipov, difinis la starpunkton de USSR pri „artefaritaj lingvoj". Ĝi, ne mirige, estis tute negativa, sed lia esprimmaniero tamen donis „iom luman perspektivon", kiel sagace vidis Mijake ŝihej en *La Revuo Orienta*. Esipov skribis:

> La ĉefa refuto de sovetaj sciencistoj estas la jeno: Esperanto kaj similaj lingvoj baziĝas sole sur la lingvoj de malgranda parto de la homaro, kaj komplete ignoras la lingvojn de la granda plimulto de la popolo — la popoloj de orienta Eŭropo, Azio, Afriko kaj Oceanio, ktp.
> Malgraŭ tre vasta propagando dum 50 jaroj, Esperanto estas uzata de ekstreme malgranda malplimulto eĉ de la homoj parolantaj eŭropajn lingvojn.

Laŭ la informo de Esipov, la lernado de Esperanto ne estas malpermesita en USSR, nek la sovetaj sciencistoj asertas, ke „mondlingvo" ne povas disvolviĝi; sed ili opinias, ke ĝi povus disvolviĝi nur en la malproksima estonteco, kiel sekvo de longa kaj vasta komunikiĝo inter la popoloj [8].

8. La unua detala pritrakto de tiu demando, el la plumo de soveta fakulo, troviĝas en libro eldonita en 1968 de la Scienca Akademio de USSR: *Kak vozniknet vseobŝčij jazyk?* (Kiel aperos universala lingvo?) de Ermar Svadost (Pavloviĉ Istomin, † 1971). La aŭtoro jesas la eblecon atingi sciencan sintezon de la lingvoj de la homaro kaj akcentas, ke necesas havi je dispono, ĝustatempe antaŭ la starigo de tutmonda komunisma socio, kiel eble plej perfektan „internacian universalan lingvon", kiu siatempe plenumu la funkciojn de la naciaj lingvoj. Tio sendube estas progreso kontraŭ la pasiva sinteno de Marr kaj la lingva imperiismo de Stalin. Sed la persistado de tradiciaj teoremoj de la oficiala soveta lingvistiko dokumentiĝas en aliaj lokoj de la libro, se, ekz., la aŭtoro pretervidas la nuntempan bezonon de internacia lingvo aŭ eĉ ne konsideras la eblecon, ke el Esperanto povus evolui „lia" universala lingvo. Anstataŭ tio, Svadost kritikas la principojn de la parolantoj de Esperanto: unue disvastigi kaj uzadi la lingvon kaj poste perfektigi ĝin; kaj, plej superflue, li retroiras kontraŭ Esipov, prenante la eluzitajn argumentojn el la ideologia rezervujo kontraŭ la „burĝa" Esperanto, kreita de la pia pacifisto Zamenhof.

21 PERSEKUTOJ KONTRAŬ LA INTERNACIA LINGVO

Ĉirkaŭ tiu tempo, unue apenaŭ rimarkite de la esperantistoj en okcidento, reviviĝis la Esperanto-Movado en Soveta Unio. Kiel tio okazis, apartenas al la plej interesaj ĉapitroj en la historio de la Internacia Lingvo. Estas ekster la kadro de tiu ĉi priskribo detale analizi tiun modelkazon de esperantista celkonscio, kontraŭaŭtoritata obstino kaj saĝa kaj prudenta agado ĉe la „bazo": sed evidente la unua iniciato ŝuldiĝas al kelkaj kuraĝaj unuopuloj en la popoldemokratioj, i.a. Pál Balkányi en Hungario kaj precipe Rudolf Burda en Ĉeĥoslovakio, kiuj klopodis unue reakiri permeson por la Movado ĉe sialandaj instancoj, sed, vidinte ke la ĉefa obstaklo estas la mankanta modelo de floranta Esperanto en Soveta Unio, decidis reveki la delonge mortintan Movadon tie[9]. Per iliaj leteroj Bokarev k.a. unuafoje eksciis en 1954/55, ke ankoraŭ ekzistas Esperanto-Movado en okcidentaj kaj orientaj landoj. La bulteno *La Pacdefendanto* kaj la organo de MEM, *Paco*, estis grandkvante liveritaj al Soveta Unio, aperigis la unuajn korespond-anoncojn de Sovet-unianoj kaj koordinis la lokan aktivadon de esperantistoj (en „pac-rondoj") en landoj sen organizita Movado. *Paco* daŭre kuraĝigis la esperantistojn, el kiuj multe preferis atendi decidon de supre, atentigante ke utiligo de Esperanto por la paco ja kongruas kun la rezolucioj de Mondpaca Konsilantaro, ke „ne eblas vin persekuti pro la plenumo de ties decidoj" kaj ke necesas „ne lasi sin puŝi en ilegalecon".

Tiun strategion sendube akcelis la surpriza sinteno de Soveta Unio kaj ĝiaj aliancanoj dum la Konferenco de Unesko en Montevideo en decembro 1954, kiam la delegacioj voĉdonis nek por nek kontraŭ la rezolucio agnoskanta la kulturan valoron de Esperanto. Tiutempe *Paco* aperigis leteron de dana leganto, kiu klare komprenigas, ke Soveta Unio ne favoras Esperanton, ĉar oni volas, ke la rusa iĝu mondlingvo. Krome, la revuo ridindigis tiujn, kiuj „volas atendi la evoluon kaj kunfandiĝon de la lingvoj, por uzi ilin kiel 'ponton'" al internacia kompreniĝo, kaj rebatis argumentojn de ĉeĥa lingvisto kontraŭ Esperanto uzante citaĵojn ĝuste de la „lingvisto" Stalin (pri „talmudistoj", kiuj „lernas parkere konkludojn kaj formulojn, kaj citadas ilin blinde").

La plua evoluo estas konata: En 1955 la pola Asocio denove aliĝis al UEA, en la sekvantaj jaroj ankaŭ la bulgara, hungara kaj ĉeĥa, en 1957 ekaperis *Nuntempa Bulgario* amase distribuata al Soveta

9. Burda mem diris: „.... por plifaciligi nian agadon en la Popoldemokratioj, necesis revivigi Esperanton en Sovjetio."

Unio, kaj de tiam la progreso de la Internacia Lingvo en tuta orienta Eŭropo iĝis ne plu haltigebla [10].

21.5 KONKLUDOJ

Persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo estas unu aspekto de lingva diskriminacio, kaj ili ofte fontis, kiel ni vidis, en lingva imperiismo: laŭ la opinioj de kaj faŝistoj kaj stalinistoj, Esperanto minacis al la pozicio de la germana aŭ rusa lingvo. Sed, eble pli grave, multaj reĝimoj unuavice timis la sekvojn de Esperanto kiel rimedo en la manoj de tiuj, kiuj — fakte aŭ ŝajne — kontraŭbatalis la sociordon aŭ kiuj serĉis internaciajn kontaktojn sen kontrolo fare de potenchavantoj.

Esperanto rezistis la ŝtormojn kaj sangan elprovon sub faŝismo kaj stalinismo. Ne estas tie ĉi loko por esplori, sub kiu politika reĝimo la Movado plej multe suferis. Neniu povas pretervidi, ke la faŝismo entenis en si ĉion, kio estas mala al Esperanto kaj ĝiaj internaciismaj kaj pacigaj trajtoj, kaj estis sekve apenaŭ mirige, ke faŝisma registaro celkonscie klopodis neniigi ne nur Esperanton, sed la tutan homaranecan grundon, sur kiu sola ĝi povas prosperi. Aliflanke, preskaŭ samtempe, en la kontraŭa tendaro, kies reganta ideologio origine havis multon komunan kun la socireformaj celadoj de la esperantistoj, furiozaj persekutoj malaperigis milojn da parolantoj de la Internacia Lingvo, eĉ plurajn, kiuj pli frue fuĝis antaŭ la faŝisma teroro.

UEA, kiu per sia Letero al Stalin la unuan fojon post multaj jaroj montriĝis en la mondo kiel atentinda kultura faktoro kaj socia forto, de tiam aplikas du rimedojn por reestabli la rajton uzi Esperanton tie, kie ĝi renkontas subpremon: unue, forigi miskomprenojn pri Esperanto, precipe tiun, ke la lingvo en si mem estas politike tendenca (kvankam tia atentigo kutime ne detenas registarojn uzi utilan pretekston por senkreditigi la ideon de internacia lingvo), kaj, due, publike kaj internacie akuzi tiujn registarojn kaj aliajn instancojn, kiuj malhelpas aŭ persekutas la uzon de Esperanto por kiu ajn celo.

En speciala agadplano de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), esploroj pri malobservoj de la lingvaj rajtoj de la homo okupis gravan rolon. Antaŭjuĝoj, diskriminacio kaj rektaj persekutoj bazitaj sur lingvaj diferencoj, lingva

10. Aparta kazo estas Rumanio, kie la limigoj kontraŭ libera aktivado de esperantistoj estas plej hezite malkonstruataj. Unu el la kaŭzoj estas supozeble la negativa sinteno de la aŭtoritata lingvisto Alexandru Graur kontraŭ artefaritaj lingvoj (vidu la artikolon „Kial la Movado ne vivas en Rumanujo", *Esperanto*, vol. 57, 1964, n-ro 5, p. 82-83).

imperiismo kaj ŝovinismo, kultura genocido kaj rasismo — ĉiuj ricevis kaj nun daŭre ricevas apartan atenton en la organo de UEA, en dokumentoj de CED, en la revuoj *La Monda Lingvo-Problemo* kaj *Kontakto* kaj estas ankaŭ la temo de apartaj seminarioj, organizitaj de TEJO.

Se nuntempe, kiam rekta subpremo de la Esperanto-Movado ŝajnas nur esti nigra ĉapitro de la historio, ni bezonas instruon por la estonteco, tiam ĝi ne povas esti alia ol tiu ĉi: silenta pasiveco, kiel praktikata ekz. dum la nazia militdeklaro al Esperanto, neniam forigos diskriminacion kontraŭ la Internacia Lingvo.

21.6 BIBLIOGRAFIO

Andreev, A. P., *Revolucio en la lingvoscienco. Jafetida lingvoteorio de akademiano N. Marr.* Leipzig 1929.

Bálint, Ferenc, *Elektitaj dokumentoj de laborista esperantista Movado en departemento Békés 1925-1934* (hungarlingva). Gyula 1969.

Boulton, Marjorie, „Nigra svastiko, verda stelo". *Zamenhof.* La Laguna 1962, p. 243-253.

Conquest, Robert, *The Great Terror,* Toronto 1968.

Cseh, Andreo, „Dum la uragano". *La Praktiko,* 1946, n-ro 1/5, p. 15-16.

Dokumentoj de la persekutoj kontraŭ proleta Esperanto-Movado (japanlingva). Oosaka 1950.

Dratwer, Isaj, „Kiel pereis la familio de D-ro Zamenhof". *Germana Esperanto-Revuo,* vol. 17, 1964, p. 57.

„Ernest Drezen". *The British Esperantist,* vol. 66, 1970, p. 344.

„Komunista enfiltrado en la Esperanto-Movadon". *Amerika Esperantisto,* vol. 73, 1960, n-ro 1, p. 3-13.

Engholm, S., „Kie oni malhelpas Esperanton". *Malgranda Revuo,* vol. 8, 1950, n-ro 1, p. 28-30.

Ĝivoje, Marinko, *Historio de Esperanto-Movado en Jugoslavio.* Zagreb 1965.

Hitler, Adolf, *Mein Kampf.* 603-607-a eld. München 1941.

Ĥvorostin, S. K., „Cara cenzuro kaj Esperanto". *Scienca Revuo,* vol. 23, 1972, n-ro 1/2, p. 37-46; n-ro 3, p. 79-88.

Kamarýt, St., „Esperanto en Ĉeĥoslovakujo dum la germana okupado". *Esperanto Internacia,* vol. 10, 1946, n-ro 1, p. 3-4.

„Kial la Movado ne vivas en Rumanujo". *Esperanto,* vol. 57, 1964, n-ro 5, 82-83.

Lapenna, Ivo, „Kelkaj lingvistikaj demandoj". *Belarto,* 1958, p. 51-63.

_____, *Retoriko.* 3-a eld. Rotterdam 1971.
Laurat, Lucien, *Staline, la linguistique et l'impérialisme russe.* Paris 1951.
„Nefermita letero: Al J. V. Stalin, Moskvo". *Esperanto,* vol. 45, 1952, n-ro 6, p. 163-165.
L'Hermitte, René, *La linguistique en U.R.S.S.* Paris 1969.
Lins, Ulrich, „Esperanto dum la Tria Regno". *Germana Esperanto-Revuo,* vol. 19, 1966, p. 76-78, 99-101; vol. 20, 1967, p. 5-8. (Iom mallongigita en *Sennacieca Revuo,* 1968, n-ro 96, p. 1-19.)
_____, „La plej sekreta libro pri Esperanto". *Esperanto,* vol. 65, 1972, n-ro 2, p. 28-29.
Miyamoto masao, *Historio de la japana Esperanto-Movado.* Kioto 1969.
Sadler, Victor, „Persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo". *Esperanto,* vol. 61, 1968, p. 14-15, 34-35, 84-85.
_____ kaj Ulrich Lins, „Regardless of frontiers: A case study in linguistic persecution". Samir K. Ghosh (red.), *Man, Language and Society.* The Hague-Paris 1972, p. 206-215.
Siebarth, Werner, *Hitlers Wollen.* 3-a eld. München 1936.
Spiridoviĉ, E., „La 'vera devizo por batalo' en la marks-leninisma lingvoscienco". *La Nova Etapo,* vol. 1, 1932, n-ro 4, p. 157-160.
Springer, George P., *Early Soviet theories in communication.* Cambridge, Mass. 1956.
Stalin, J., *Marxismus und Fragen der Sprachwissenschaft.* N. Marr, *Über die Entstehung der Sprache.* München 1968.
Streicher, Oskar, „Weltsprache". *Muttersprache,* vol. 41, 1926, kol. 133-139.
Sygnarski, Mieczysław, „Kion opinias la junularo pri Esperanto?" *Internacia Pedagogia Revuo,* vol. 17, 1938, n-ro 1, p. 6-14.
Takeuti zirô, *Puroretaria esuperanto undô ni tuite.* Tôkyô 1939.
„Tezoj pri Internacia Lingvo". *La Nova Etapo,* vol. 1, 1932, n-ro 3, p. 116-118.
Theobald, H., *Dokumentoj de la rezistado.* Hamburg 1948.
Thomas, L. L., *The linguistic theories of N. Ja. Marr.* Berkeley-Los Angeles 1957.
Trögel, Robert, *Esperanto kaj kulturo.* Köln 1929.
Vossler, Karl, *Geist und Kultur in der Sprache.* Heidelberg 1925.
Wagner, Hermann, *Ni devas diri ĝin.* Stuttgart 1947.
Weissberg, Alex, *Conspiracy of silence.* London 1952.
Vidu ankaŭ la bibliografiojn de Ĉapitroj 14 kaj 19.

ĈAPITRO 22

LA DEMANDO DE KOMUNA LINGVO ANTAŬ INTERNACIAJ INSTITUCIOJ

22.1 ENKONDUKA RIMARKO

Plurfoje diversaj internaciaj registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj okupiĝis pri la demando de komuna lingvo en internaciaj rilatoj, tute speciale pri la Internacia Lingvo (Esperanto). Tri el ili meritas apartan atenton: la diskutoj en la sino de la Ligo de Nacioj en la periodo 1920-1925; la Peticio al Unuiĝintaj Nacioj (UN) en 1950, kiu estis poste transdonita al Unesko kaj kiu kondukis al la Rezolucio de 1954; la Propono al Unuiĝintaj Nacioj, prezentita al la Sekretariato de UN en New York en oktobro 1966.

Por doni kiel eble plej objektivan bildon pri la traktado de tiu demando en la menciitaj institucioj, en la sekvantaj sekcioj de tiu ĉi ĉapitro estos unuavice reproduktitaj esencaj partoj de originalaj dokumentoj en Esperanta traduko, dum la cetera teksto estos limigita al la plej necesaj klarigoj, korektoj de eraroj pri faktoj kaj kelkaj komentoj.

22.2 LIGO DE NACIOJ (1920 - 1925)

22.2.1 Ĉefa Celo kaj Lingva Obstaklo

Post la Unua Mondmilito, en la tempo de fondiĝo kaj ekfunkcio de la Ligo de Nacioj, la Internacia Lingvo jam estis disvastiĝinta preskaŭ en ĉiuj partoj de la mondo. Ĝia traduka kaj originala literaturo estis rimarkinda, la nombro de diversaj periodaĵoj konsiderinda, kaj

la praktika parola uzo dum kongresoj kaj ĉiaspecaj aliaj internaciaj renkontiĝoj ĉiam pli vasta. Ĝi jam estis fariĝinta nekontestebla socia fakto.

La ĉefa celo de la Ligo de Nacioj estis konservi la mondan pacon kaj akceli amikajn rilatojn inter la nacioj. Multaj rigardis ĝin taŭga instrumento por la realigo de jarcentaj revoj pri paca kunvivado de la popoloj; inter ili troviĝis ankaŭ klarvidaj personoj, kiuj komprenadis, ke la lingvaj malfacilaĵoj grave obstaklas la progreson en tiu direkto.

22.2.2 Propono al la Unua Asembleo

En tiaj kondiĉoj ekaktivis D-ro E. Privat, kiu en la unuaj jaroj de la Ligo de Nacioj estis honora jura konsilisto de la persa ĉefdelegito, Princo Arfa, kaj poste fariĝis vicdelegito de Persio ĉe la Ligo. Laŭ lia iniciato dek unu delegitoj prezentis al la Asembleo la 9-an de decembro 1920 projekton de Rezolucio, kiu tekstis:

> La Ligo de Nacioj, konscia pri la lingvaj malfacilaĵoj, kiuj obstaklas rektan komunikadon inter la popoloj, kaj pri la urĝa bezono trovi ian praktikan rimedon por forigi tiun ĉi obstaklon kaj helpi al bona interkompreniĝo inter la nacioj, sekvas kun intereso la eksperimentojn rilate oficialan instruadon de la Internacia Lingvo Esperanto en la publikaj lernejoj de kelkaj el la membroj de la Ligo; esperas, ke tiu instruado fariĝos pli ĝenerala en la tuta mondo, tiel ke la infanoj de ĉiuj landoj povus scii almenaŭ du lingvojn: sian gepatran kaj facilan rimedon por internacia komunikado; (kaj) petas la Ĝeneralan Sekretarion prepari por la sekva Asembleo raporton pri la rezultoj atingitaj en tiu ĉi rilato [1].

La projekto elvokis fortan kontraŭstaron precipe de Francio, kiu en tiu tempo, minacata de la kreskanta prestiĝo de la angla lingvo, vidis en la propono novan danĝeron por la pozicio de la franca. Laŭ artikolo de E. Privat en *Esperanto* de aprilo 1958, la franca delegito kolere intervenis kontraŭ tiu rekomendo, ĉar ĝi tuŝis la sendependecon de la publika instruado en lia lando kaj „minacis la patrujaman edukadon de la infanoj per internaciismo". Konforme al tiu politiko, la tiama franca Ministro de Instruado, Léon Bérard, malpermesis kian ajn kurson de Esperanto ne nur en la lernejoj, sed eĉ en la konstruaĵoj de lernejoj.

La proponon unue ekzamenis la Dua Komitato de la Ligo. En sia Raporto al la Asembleo, entenata en la Dokumento 253: 20/48/253, la Komitato faris jenajn konstatojn:

1. League of Nations, *Assembly Document* 253, 17 December 1920: 20/48/194.

La Komitato konsentas kun la subskribintoj rilate la seriozecon de la lingvaj malfacilaĵoj, kiuj obstaklas rektajn rilatojn inter la popoloj, kiel ankaŭ rilate la deziron, ke internacia lingvo devus esti instruata en ĉiuj lernejoj: simpla kaj facila lingvo, kiun la infanoj lernus paralele kun sia gepatra lingvo, kaj kiu devus servi la estontajn generaciojn kiel ĝenerala rimedo de internacia komunikado. La Komitato tamen opiniis, ke estus dezirinde komenci per enketo surbaze de la ekzistantaj faktoj.... Fine, la Komitato estis informita, ke tiu ĉi internacia helpa lingvo estis utiligata kun sukceso en pluraj konsiderinde universalaj kongresoj, en kiuj la parolantoj apartenantaj al ĉiuj landoj povis facile kompreni unu la alian, kaj en kiuj la debatoj okazis en unusola lingvo, tiel ke la parolantoj ĝuis la plej kompletan egalecon.

La Komitato, tamen, opiniis, ke la Asembleo devus ne akcepti respondecojn ekster sia kompetenteco. Tial ĝi forigis la alvokon por ĝenerala instruado de la Internacia Lingvo. Laŭ la menciita dokumento, la fina propono de la Komitato al la Asembleo tekstis:

La Ligo de Nacioj, konscia pri la lingvaj malfacilaĵoj kiuj obstaklas rektan komunikadon inter la popoloj, kaj pri la urĝa bezono trovi ian praktikan rimedon por forigi tiun ĉi obstaklon kaj helpi al bona interkompreniĝo inter la nacioj, sekvas kun intereso la eksperimentojn rilate oficialan instruadon de la Internacia Lingvo Esperanto en la publikaj lernejoj de kelkaj el la membroj de la Ligo; (kaj) rekomendas al la Ĝenerala Sekretario prepari por la sekva Asembleo raporton pri la rezultoj atingitaj en tiu ĉi rilato.

La raportisto, la belga senatano Lafontaine, prezentis la rekomendon al la lasta plena sesio de la Asembleo, sed la prezidanto — Hymans, ankaŭ li Belgo — tuj interrompis lin kun pririda ŝerco. La franca delegito Gabriel Hanotaux, tiutempe bone konata diplomato, proponis ke oni entute ne diskutu la aferon, ĉar „jam ekzistas internacia lingvo: la franca, universale instruata ĉie en la mondo de la penso". La prezidanto tuj voĉdonigis la proponon, ke la diskuto estu prokrastita; post iom da konfuzo li deklaris, ke la demando estas forŝovita. Sekve, la Raporto de la Dua Komitato ne estis akceptita de la Unua Asembleo en 1920.

22.2.3 Renovigo de la Propono al la Dua Asembleo

La 9-an de septembro 1921, okaze de la Dua Asembleo de la Ligo de Nacioj, la propono de 1920 estis renovigita en identa formo. Ĉi-foje ĝi estis prezentita de la delegitoj de Sudafriko, Rumanio, Persio, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Kolombio, Ĉinio, Finnlando, Albanio, Japanio, Venezuelo kaj Hindio. La proponon subskribis ankaŭ la delegito de

Pollando, sed kun rezervo, karakteriza por la tiama starpunkto de Pollando rilate la francan lingvon, ke „praktika helpa lingvo neniel atencu la rajtojn kaj jarcentan prestiĝon de la franca lingvo kiel lingvo de internacia diplomatio".

La subskribintoj samtempe petis la Prezidanton de la Asembleo, ke la menciita Raporto de la Dua Komitato kun la titolo Internacia Lingvo (Dokumento 253 de la 17-a de decembro 1920) kaj la Raporto de D-ro Nitobe inazo, la tiama Ĝenerala Subsekretario de la Ligo, pri lia komisio en la Universala Kongreso de Esperanto en Prago, estu komunikitaj al ĉiuj delegacioj. La du dokumentoj estis efektive distribuitaj al la delegacioj kaj la Propono eniris en la tagordon de la Dua Asembleo.

La Raporto de D-ro Nitobe rilatis al la rezultoj de lia oficiala partopreno kiel observanto de la Ligo en la 21-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en aŭgusto 1921 en Prago. Tiun kongreson ĉeestis 2.561 delegitoj el 40 landoj kaj oficialaj reprezentantoj de 10 registaroj.

La originala Raporto de D-ro Nitobe konsistis el tri partoj, el kiuj la unua entenis faktojn pri la menciita Esperanto-Kongreso kaj la dua enhavis rimarkojn pri la Esperanto-Movado. Nur la tria parto estis komunikita al Konsilo de la Ligo, al la Ŝtatoj-Membroj kaj al la delegacioj sub la titolo *La Lingva Demando kaj la Ligo de Nacioj*[2].

Tiu ĉi objektiva analizo de la tiama lingva situacio kaj de la diversaj avantaĝoj, kiujn prezentas neŭtrala lingvo, verkita de unu el la plej altrangaj internaciaj funkciuloj surbaze de personaj esploroj kaj spertoj, devus esti konata de ĉiu studanto de la lingva problemo. Des pli, ke multaj konstatoj estas hodiaŭ same aŭ eĉ pli aktualaj, ol ili estis en 1921.

Pri la bezono de facila komuna lingvo en la Ligo de Nacioj por adekvata reprezentiĝo D-ro Nitobe skribis:

> En multaj landoj la elekto de delegitoj por la Konsilo aŭ por la Asembleo estas limigita al la tre mallarĝa cirklo de tiuj, kiuj povas regi la anglan aŭ francan almenaŭ kun relativa facileco, kaj kutime — ĉar tiu ĉi cirklo konsistas el diplomatoj, profesiaj lingvistoj, lernejaj instruistoj kaj komercistoj — multaj el la plej kompetentaj por la laboro de la Ligo de Nacioj estas preterpasitaj. Kiam la paroladoj estas faritaj en kunvenoj en lingvo ne komprenata de ĉiuj, iuj membroj emas forlasi la salonon aŭ fariĝi senpaciencaj.... (p. 2 de la angla versio).

2. League of Nations, *The language question and the League of Nations*, Report by Dr. Nitobe, Doc. A.72.1921.XII of 14 September, 1921.

D-ro Nitobe kritike rilatas al antaŭjuĝoj de politikistoj kaj aliaj koncerne la eblecon de internacia lingvo. En la Raporto estas akcentita la kultura graveco de internacia lingvo kaj la konstrua rolo de tia lingvo por la realigo de la idealoj de la Pakto de la Ligo.

La Raporto konstatas la kreskantan nombron de naciaj lingvoj kaj koncize resumas la staton per la sekvantaj vortoj:

> Nur en Eŭropo 49 lingvoj estas nuntempe uzataj. Inter la 48 Membroj de la Ligo funkcias ne malpli ol 48 apartaj lingvaj sistemoj, se oni ekskludas iujn gravajn dialektojn. Plue, kiam la angla kaj franca estis akceptitaj kiel praktike la solaj oficialaj lingvoj pro kaŭzoj de ekonomio, kiel diras la Raporto de la Komitato, tiu decido signifis ŝajnan ekonomion el mallarĝa vidpunkto rilate ŝparadon de tempo kaj mono por traduko. Mondvasta vidpunkto de ekonomio rezultigos tute alian juĝon.... El vidpunkto de monda ekonomio neniu rimedo estas pli racia kaj pli malmultekosta ol la adopto de komuna lingvo (p. 3 de la angla versio).

En la sekvaj partoj D-ro Nitobe prezentas la bezonon de komuna lingvo sur la kampoj de komerco kaj scienco, kaj mencias diversajn rezoluciojn kaj decidojn de kompetentaj instancoj favore al la solvo de la lingvaj malfacilaĵoj per neŭtrala internacia lingvo. Aparte interesaj estas la pensoj pri la bezono de internacia lingvo por la laboristaro. La Raporto konstatas, ke Esperanto jam estas tre disvastiĝinta inter la laboristoj kaj ke tiamaniere ĝi fariĝas „motoro de internacia demokratio".

En la konkluda parto de la Raporto estas dirite, ke multaj potencaj organizaĵoj kun tre malsamaj celoj kaj agantaj sur vastaj kampoj de homaj aktivadoj deziras praktikan solvon de la lingva demando. La progreson de la mondo obstaklas la lingvaj baroj kaj tio — diras D-ro Nitobe — prezentas seriozan minacon al la afero de paco.

La Dua Asembleo akceptis la konkludojn de la Dua Komitato de la 17-a de decembro 1920, instrukciis la Sekretariaton entrepreni la proponitan enketon, kaj decidis meti la demandon pri instruado de Esperanto en la lernejoj en la tagordon de la Tria Asembleo. La koncerna Rezolucio estis akceptita la 15-an de septembro 1921.

22.2.4 Tria Asembleo: Akcepto de la Raporto de la Sekretariato

Plenumante la decidon de la Asembleo, la Sekretariato senprokraste dissendis demandaron al ĉiuj Ŝtatoj-Membroj de la Ligo kaj al diversaj kompetentaj organizaĵoj. Ĝi ankaŭ disponigis la necesajn salonojn en la Palaco de la Ligo en Ĝenevo por okazigo de Internacia Konferenco pri Instruado de Esperanto en Lernejoj en aprilo 1922. Partoprenis reprezentantoj de komunumaj kaj lernejaj aŭtoritatoj,

kiel ankaŭ de edukaj asocioj el 28 landoj. Registaroj de 16 ŝtatoj sendis siajn oficialajn observantojn. Tiu ĉi teknika konferenco, kunvokita de la Lernejo pri Eduka Scienco (Instituto J. J. Rousseau en Ĝenevo), pritraktis la tutan demandon en scienca kaj senpartia spirito. Ĝi liveris al la Sekretariato de la Ligo la plej grandan parton de informoj rilate la instruadon de Esperanto en lernejoj. En la teksto de la konkludo, kiu estis sendita al la Sekretariato, troviĝis ankaŭ jena grava propono:

> La Ligo de Nacioj rekomendas, ke tiu ĉi instruado fariĝu ĝenerala en la publikaj lernejoj de la tuta mondo kiel praktika kaj populara rimedo por internacia rilatado, neniel celanta prejudici la epoklongan prestiĝon de la civilizitaj naciaj lingvoj.

La Sekretariato ricevis ankaŭ konsiderindan nombron da dokumentoj kaj proponoj koncerne la lingvan problemon ĝenerale kaj la eblajn solvojn. Ekzemple, influaj skandinaviaj asocioj proponis, ke la angla estu adoptita kiel monda helpa lingvo. Kelkaj amerikaj rondoj sugestis la revivigon de la latina.

Surbaze de la kolektitaj informoj la Sekretariato verkis ampleksan raporton *Esperanto kiel Internacia Helpa Lingvo*[3], kiu originale konsistis el kvin partoj. En la fino troviĝis kvar aldonoj kun diversaj dokumentoj. La raporto, datita la 28-an de junio 1922, estis prezentita al la Tria Asembleo.

En la enkonduka parto de la raporto estas koncize prezentita la evoluo de la afero antaŭ la Ligo de Nacioj ekde la unua propono en 1920. Estas akcentite, ke la Sekretariato ricevis instrukcion studi la demandon unuavice el praktika vidpunkto. Agante konforme, ĝi povis konstati, ke Esperanto estas vaste uzata en internaciaj kongresoj kaj ĉiaspecaj renkontiĝoj, dum vojaĝoj, en internaciaj oficejoj kaj eĉ por teatraj prezentadoj. Rilate tiun aspekton de la demando la raporto konkludas:

> Tio faras ĝin vivanta lingvo — karakterizo, kiun ne posedas kiu ajn el la sistemoj nur skribaj kaj ne parolataj. Fariĝis eble esprimi sentojn en ĝi. Post 35 jaroj (de funkciado) la lingvo komencis akiri stilon. Ekzistas verkistoj kaj oratoroj, kiuj uzas ĝin kun veraj forto kaj eleganto. Pro la fakto, ke la akcento troviĝas sur la antaŭlasta silabo kaj ke la finaĵoj estas vokaloj, ĝiaj sonoraj kvalitoj memorigas pri iu el la romanidaj lingvoj de la sudo.

3. La originala titolo de la angla teksto estas: *Esperanto as an International Auxiliary Language*. Report of the General Secretariat of the League of Nations, adopted by the Third Assembly, 1922. Document A.5.(1).1922. Ĉiuj citaĵoj estas prenitaj el tiu ĉi presita libreto.

22 KOMUNA LINGVO ANTAŬ INTERNACIAJ INSTITUCIOJ

En la dua ĉapitro estas prezentita la stato de instruado de Esperanto en diversaj lernejoj de Albanio, Bulgario, Brazilo, Belgio, Ĉinio, Finnlando, Francio (ne en la ŝtataj), Britio, Italio, Japanio, Nederlando, Portugalio, Svislando kaj Ĉeĥoslovakio. Rilate la ŝtatojn, kiuj en tiu tempo ne estis membroj de la Ligo, la raporto koncize prezentas la situacion en Germanio, Hungario, Ruslando kaj Usono.

La tria ĉapitro prezentas la ĉefajn rezultojn de la Esperanto-instruado en la lernejoj. La plej gravaj dokumentoj estas presitaj en la aldonoj al la raporto. Rilate tiun aspekton la raporto emfazas la grandan moralan efikon je la infanoj, kiuj, korespondante kun infanoj de aliaj landoj en Esperanto, evoluigas interesiĝon pri aliaj nacioj, pri geografio kaj historio. Ofte evidentiĝas spirito de tuthoma solidareco. Multaj geinstruistoj utiligas la Esperanto-lecionojn por interesigi al la infanoj la Ligon de Nacioj kaj ĝian grandan idealon de universala paco kaj kunlaborado.

Koncize estas menciitaj la spertoj en la lernejoj de Skotlando, Italio, Ĉeĥoslovakio kaj aliaj landoj. Reprezentantoj de landoj el Malproksima Oriento akcentis la facilecon de Esperanto kompare kun fremdaj naciaj lingvoj. Pri la facileco de Esperanto la raporto konkludas:

> Oni povas aserti kun absoluta certeco, ke Esperanto estas ok ĝis dek fojojn pli facila ol kiu ajn fremda lingvo, kaj ke estas eble ellerni perfektan parolkapablon sen forlasi sian propran landon. Tio per si mem estas tre aprezinda rezulto.

La kvara ĉapitro traktas la uzadon de la Internacia Lingvo en la praktiko. Estas menciitaj multnombraj foiroj, kiuj uzas tiun lingvon, katalogoj kaj prospektoj de komercaj entreprenoj, gvidlibroj, fakaj periodaĵoj, beletristiko, scienca kaj faka literaturo, la uzo de Esperanto por internaciaj kontaktoj de blinduloj kaj aliaj aspektoj. La raporto finiĝas per jenaj vortoj:

> Lingvo estas potenca forto, kaj la Ligo de Nacioj havas ĉian kaŭzon por observi kun aparta intereso la progreson de la Esperanto-Movado, kiu, se ĝi fariĝos pli disvastiĝinta, povos iam konduki al grandaj rezultoj el la vidpunkto de morala unueco de la mondo.

Dum la tria Asembleo, en aŭtuno 1922, la raporton pritraktis la Kvina Komitato. La konkludojn de la raporto forte subtenis Prof. Gilbert Murray, la fama helenisto el Oxford, kiu reprezentis Sudafrikon. La ĉefaj oponantoj estis f-ino Forchhammer (Danlando) kaj s-ro Rio Branco, ambasadoro de Brazilo, kiu atakis Esperanton kiel „lingvon de mizeruloj kaj komunistoj", eĉ private presigis kaj disdonis sian paroladon. La franca delegito, samtempe raportisto en la

Komitato, senatano G. Reynald, deklaris, ke li ricevis instrukciojn malaprobi kian ajn „mondlingvon" kun la escepto de la franca. Li proponis, ke la tuta afero estu transdonita al la Komisiono pri Intelekta Kunlaborado. Delegitoj de Finnlando, Persio, Ĉinio, Bulgario, Japanio esprimis timon, ke la celo de la propono de senatano Reynald estas enterigi la aferon. Post tritaga diskutado, ofte pasia, la Kvina Komitato akceptis kompromisan solvon: unuflanke aprobi kun malgrandaj modifoj la Raporton de la Sekretariato, kaj aliflanke sendi la lernejan demandon por pritrakto al la Komisiono pri Intelekta Kunlaborado. Estis ankaŭ decidite aldoni la kompletan tekston de la Raporto de la Pariza Komerca Ĉambro, tre favora al la Internacia Lingvo.

La teksto, kiun la Kvina Komitato prezentis al la Asembleo, estis akceptita per plimulto de voĉoj. Jen ĝia traduko:

1. Ke la Raporto de la Sekretariato pri Esperanto kiel Helpa Internacia Lingvo estu adoptita, sed kun la sekvantaj amendoj:
(a) Ke la korektoj komunikitaj de la Brita Delegacio estu faritaj kaj ke Ĉapitro V de la Raporto estu ellasita.
(b) Ke al la Raporto estu aldonita anekso konsistanta el la tuta mallonga kaj senpartieca Raporto de la Pariza Komerca Ĉambro de la 9-a de februaro 1921, el kiu nur kelkaj partoj estis cititaj.
(c) Ke la rezolucioj akceptitaj de la Komitato estu aldonitaj al la Raporto.
2. Ke la demandoj rilatantaj al instruado de Esperanto estu transdonitaj al la Komisiono pri Intelekta Kunlaborado, por ke tiu Komisiono povu doni sian opinion pri la diversaj aspektoj de la problemo de helpa internacia lingvo.

Dum sia kunveno de la 21-a de septembro 1922 la Tria Asembleo akceptis la Raporton de la Kvina Komitato. Tiamaniere ĝi oficialigis la Raporton de la Sekretariato de la 28-a de junio, sen la kvina ĉapitro, sed kun ĉiuj supre menciitaj aldonoj.

22.2.5 Komisiono pri Intelekta Kunlaborado

Konforme al la decido de la Tria Asembleo, la Komisiono pri Intelekta Kunlaborado (angle: *Committee on Intellectual Co-operation)* okupiĝis pri la demando dum tri kunsidoj de la 31-a de julio kaj 1-a de aŭgusto 1923 [4].

Komence de la matena kunsido de la 31-a de julio la prezidanto memorigis, ke la Asembleo komisiis la Komisionon pritrakti la in-

4. League of Nations, *Committee on Intellectual Co-operation. Minutes of the Second Session.* Geneva, 26.7.-2.8.1923: C 510.M.224.1923.XII, 73-74 and 77, pp. 36-42.

struadon de Esperanto kaj entute doni sian opinion pri la demando de „helpa internacia lingvo".

Tuj manifestiĝis du kontraŭaj starpunktoj. S-ro Torres de Quevedo (Hispanio) rigardis la demandon grava kaj proponis, ke estu nomita subkomitato por studi, kun la helpo de spertuloj, la eblajn solvojn de la lingva problemo. La ĉefa kontraŭulo de tiu propono kaj precipe de Esperanto estis Prof. Gonzague de Reynold. La aliaj membroj prenis diversajn poziciojn, sed la plimulto apogis la starpunkton de s-ro de Reynold, kiu tamen estis fine devigita iom reformuli la tekstojn de siaj rezolucioj, proponitaj en la komenco.

La legado de la protokoloj pri tiu preskaŭ dutaga diskuto evidentigas, ke la plimulto de la membroj de la Komisiono havis neniajn aŭ nur tre limigitajn sciojn pri la traktata demando. Ignorado de bazaj faktoj, aŭ gravaj misprezentoj kaj misjuĝoj pri faktoj, intermiksiĝis kun ia supereca, pseŭdo-intelekta malŝato al la popolaj amasoj. Ne eblas ne fari almenaŭ kelkajn kritikajn rimarkojn.

S-ro de Reynold, ekzemple, unue deklaris, ke li studis la problemon de „helpa lingvo" el ĉiuj flankoj kaj havigis al si kompetentajn opiniojn. Kun tiuj akiritaj scioj li asertis, ke Esperanto havas malfacilan skribon, bazitan sur fonetika sistemo, kaj ke ĝia alfabeto estas komplikita, ĉar ĝi enhavas ankaŭ „akcentitajn konsonantojn laŭ la slava maniero" (*„consonnes accentuées à la manière slave"*). Fakte, kiel bone scias ĉiu uzanto de Esperanto, la alfabeto de la Internacia Lingvo estas la plej simpla, kiun oni povas imagi ĝuste tial, ĉar ĝi estas fonetika kaj sekve devas havi kelkajn supersignitajn literojn. En la slavaj landoj ĉiu infano povas legi kiun ajn Esperanto-tekston preskaŭ sen kia ajn antaŭlernado; en aliaj landoj ne necesas pli ol 1-2 horoj por atingi tion, depende de la nacilingva aparteno kaj persona talento.

S-ro Destrée (Belgio) rimarkigis, ke intelektuloj uzas 6.000 ĝis 8.000 vortojn. Por tiuj, kiuj ne bezonas pli ol 600 vortojn, Esperanto estas utila, sed por „intelektuloj" estos pli bone, ke ili studu la „vivantajn lingvojn". Fakte, jam en la tempo de tiu diskuto la ĝenerala vortprovizo de la Internacia Lingvo (sen la teknikaj vortaroj) estis preskaŭ 8.000 vortradikoj, el kiuj, pro la aglutina karaktero de la lingvo, oni povis derivi ĉ. 80.000 vortojn. Eĉ la plej malgrandaj vortaretoj, la t.n. ŝlosiloj de Esperanto, enhavis ĉ. 1.200 radikojn, do multe pli ol bezonis la membroj de la Komisiono pri Intelekta Kunlaborado, kiuj verŝajne ne uzis pli ol 600 vortojn por la tuta debato pri la lingva problemo kaj Esperanto.

S-ro Luchaire esprimis la opinion, ke eĉ „ne-intelektuloj" apenaŭ bezonas internacian komunikilon, ĉar la popolaj amasoj de diversaj landoj eniras en reciprokajn kontaktojn pere de siaj „gvidantoj" kaj

pere de tradukoj. Denove manifestiĝis fundamente erara starpunkto, laŭ kiu la internaciaj kontaktoj devus esti monopolo de elektitoj, dum por la amasoj la pordo devus resti fermita por ĉiam. Li ankaŭ diris, ke por la „intelektuloj" de Oriento, se ili deziras ekkoni la okcidentajn mediojn, estas utile lerni unu aŭ du eŭropajn „grandajn lingvojn". Kvazaŭ la tuta okcidenta kulturo estus kreita per 1-2 „grandaj lingvoj" de Eŭropo kaj kvazaŭ la scio de tiuj 1-2 eŭropaj lingvoj fakte ebligus la konatiĝon kun la tuta okcidenta kulturo. Cetere, s-ro Luchaire eĉ ne venis al la ideo diri, ke, se la „intelektuloj" de Eŭropo deziras ekkoni la kulturojn de Oriento, ili devus lerni unu aŭ du grandajn lingvojn de Azio.

Aliflanke, s-ro Lowes Dickinson emfazis, ke la utileco kaj avantaĝoj de komuna lingvo estas nekontesteblaj. Li atentigis pri la malfacilaĵoj, kiujn kaŭzas la uzo de du „oficialaj lingvoj" en la Ligo de Nacioj. Preskaŭ antaŭvidante la nunan lingvan situacion en UN, Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, li rimarkigis, ke tiuj malfacilaĵoj estos eĉ pli grandaj, se oni aldonos al la franca kaj angla aliajn oficialajn lingvojn. Tial li subtenis la proponon de s-ro Torres de Quevedo, ke aparta subkomitato daŭrigu la studon de la demando. Tio des pli, ĉar — li sincere rekonis — ne ĉiuj membroj de la Komisiono havis la okazon studi la aferon.

Aŭdiĝis ankaŭ la kutimaj sugestoj, ke oni devus unuavice rekomendi la studon de naciaj lingvoj kaj de nacilingvaj literaturoj por ebligi la komprenon de aliaj nacioj kaj por ekŝati ilin. Tamen, neniu kuraĝis fronti la realaĵon kaj rekoni, ke ĉie en la mondo milionoj da junaj homoj ja lernis kaj lernas fremdajn naciajn lingvojn kun la rezulto, ke post multjara studado malofte iu kapablas skribi simplan leteron sen gramatikaj kaj aliaj eraroj, dum la grandega plimulto apenaŭ scias diri en la „ellernita lingvo", ke ili ne scias ĝin. Neniu atentigis, ke la vera problemo ne estas „ekkompreni kaj ekŝati" unu aŭ du naciojn, sed trovi la rimedon por komunikadi kun ĉiuj, ekkoni kaj kompreni la mondon en ĝia tuteco, kun ĉiuj ĝiaj kulturaj apartaĵoj. Cetere, la personoj, kiuj donas al aliaj konsilojn studi fremdajn lingvojn, kutime esprimas sin nur en sia propra gepatra, ĉar ili mem ne scias aŭ ne regas kontentige kiun ajn alian.

En tia atmosfero de antaŭjuĝoj kaj foresto de elementaj scioj la Komisiono decidis per ses voĉoj, unu kontraŭ kaj tri sindetenoj, ne studi la demandon pri instruado de Esperanto en la lernejoj, nek rekomendi „artefaritan lingvon" [5] al atento de la Ligo.

5. Ne nur en la Rezolucio, sed dum la tuta diskuto oni uzis la esprimon „artefarita lingvo" kaj kontraŭstarigis ĝin al la kvazaŭe „naturaj naciaj lingvoj". Tia biologiigo de socia fenomeno estas science nedefendebla. Vidu ankaŭ Ĉap. 2.4.

Antaŭ ol la decido estis farita, D-ro Nitobe intervenis kaj klarvide esprimis la timon, ke post dudeko da jaroj, kiam la nombro da personoj parolantaj Esperanton fariĝos pli granda, „ili povus rigardi ĉian kontraŭan aŭ malfavoran rezolucion de tiu ĉi Komisiono kiel signon, ke mankis al ĝi saĝo".


Fakte, ne necesis atendi dudek jarojn. La legado de tiu decido en Esperanto-traduko tri tagojn poste dum la UK de Esperanto en Nürnberg (aŭgusto 1923), kiun ĉeestis preskaŭ 5.000 personoj el ĉiuj partoj de la mondo, elvokis ridegon de la tuta aŭdantaro. Kaj post dudek jaroj la Ligo de Nacioj, fiaskinte rilate sian ĉefan taskon, ne plu funkciis, dum hodiaŭ apenaŭ troviĝas unuopuloj, kiuj rememoras, ke iam ekzistis ia Komisiono pri Intelekta Kunlaborado.

22.2.6 Kvara kaj Kvina Asembleoj: Esperanto Klara Lingvo en Telegrafio

Dum la Kvara Asembleo de la Ligo (1923) Prof. Jacques Bardoux (Francio) alvenis kun la instrukcio ekspluati la negativan respondon de la Komisiono pri Intelekta Kunlaborado por „definitive elpuŝi Esperanton". Li do prezentis sian proponon al la Kvina Komitato sub formo de rezolucio rekomendanta la studon de fremdaj lingvoj anstataŭ la lernado de artefarita helplingvo". Sed en tiu ĉi kazo alinaciaj delegacioj malkonsentis. Pluraj klarigis al Prof. Bardoux, ke ili ne volas insisti pri Esperanto por ne malplaĉi al lia registaro, sed ke ili ankaŭ ne deziras akcepti ion, kio povus ŝajni en kiu ajn senco kontraŭ Esperanto. Prof. Bardoux fine retiris sian proponon kaj la *Rezolucio de la Komisiono pri Intelekta Kunlaborado estis neniam akceptita aŭ aprobita en kiu ajn formo fare de la Ligo. Restis, do, nur la oficialigita Raporto de la Sekretariato de la 28-a de junio 1922, kiel prezentite supre.*

En 1924 okazis ŝanĝoj en la franca registaro. La nova ĉefministro Herriot decidis nuligi la cirkuleron de Léon Bérard, per kiu estis malpermesita la instruado de Esperanto en la francaj lernejoj. S-ro Herriot eĉ donis subtenon al la propono de la persa, ĉina, japana, nederlanda kaj aŭstralia delegitoj, ke Esperanto estu rekonita kiel „klara lingvo" en telegrafio. La propono estis prezentita al la Dua Komitato de la Kvina Asembleo en 1924, kiu akceptis ĝin per 13 voĉoj kontraŭ 9. La 20-an de septembro 1924 la decido de la Dua Komitato estis unuanime konfirmita de la Plena Kunsido de la Asembleo.


Dum la Konferenco de Universala Telegrafa Unio (ekde 1932 Unio Internacia de Telekomunikado), okazinta en Parizo en septembro 1925, estis pritraktita ankaŭ la rekomendo de la Ligo. La Konferenco akceptis la rekomendon kaj sekve amendis paragrafon 3 de Art. VII de





Edmond Privat (supre): Persista kaj aŭtoritata pledo ĉe la Ligo de Nacioj.

D-ro Nitobe inazo (supre dekstre), ĝenerala subsekretario de la Ligo de Nacioj, juĝis Esperanton "motoro de internacia demokratio".



Dekstre: la raporto de la Ligo de Nacioj *Esperanto kiel internacia helplingvo.*

sia Statuto por aldoni la Internacian Lingvon al la lingvoj, kies uzo estas permesita. Tiu decido restis senŝanĝa kaj plu validas.

22.3 UNUIĜINTAJ NACIOJ KAJ UNESKO (1950 - 1954)

22.3.1 Peticio Favore al Esperanto

Post la Dua Mondmilito Universala Esperanto-Asocio organizis mondan kampanjon favore al la Internacia Lingvo. Tiucele estis presita mallonga deklaracio en 25 ĉefaj lingvoj de la mondo. La teksto de la Deklaracio estas:

> Mi opinias, ke la solvo de la problemo de internacia lingvo havas grandan praktikan gravecon kaj ke Unuiĝintaj Nacioj devus preni ĝin en seriozan konsideron.
> Mi opinias, ke monda helpa lingvo, kiu ne forigos la lingvojn naciajn, sed servos al ili kiel helpa lingvo, estas necesa por faciligi la rilatojn inter la popoloj de la tuta mondo kaj por rapidigi la socian progreson. Pro la bona akcepto de Esperanto en ĉiuj partoj de la mondo — la sola helpa lingvo, kiu havis rimarkindan sukceson — mi esperas, ke Unuiĝintaj Nacioj helpos, per ĉiuj rimedoj disponeblaj, la vastigon de la uzo de tiu ĉi lingvo, ekzemple kuraĝigante ĝian instruadon en la lernejoj, kiuj disponas pri kompetentaj instruistoj, kaj evoluigante ĝian uzon en la turismo, internacia komerco kaj korespondado.

En la tuta mondo estis kolektataj subskriboj de gravaj organizaĵoj kaj unuopaj personoj. Ĝis la fino de 1949 ĉa Petskribon (Deklaracion) subskribis 492 internaciaj kaj naciaj organizaĵoj kun entute 15,454.780 membroj kaj, krome, 895.432 individuaj personoj. La subskriboj estis kolektitaj en 76 landoj. Laŭ la nombro de subskriboj ili estas vicigitaj jene: Germanio, Japanio, Ĉeĥoslovakio, Nederlando, Britio, Aŭstrio, Pollando, Norvegio, Italio, Finnlando, Francio, Brazilo, Svedio, Belgio, Hungario, Islando, Bulgario, Jugoslavio, Danlando, Usono, Argentino, Urugvajo, Portugalio, Aŭstralio, Svislando, Novzelando, Egiptio, Grekio, Maroko, Palestino, Ĉinio, Kanado, Ĉilio, Irlando, Hindio, Sudafriko, Hispanio, Portoriko, Irako, Malajo, Kubo, Alĝerio, Kenjo, Filipinoj, Luksemburgo, Madagaskaro, Tunizio, Ora Bordo, Nigerio, Rodezio, Siamo, Kongo, Siera Leono, Angolo, Malto, Brita Centra Afriko, Libano, Indonezio, Bolivio, Cejlono, Irano, Kostariko, Rumanio, Soveta Unio, Etiopio, Hongkongo, Kanariaj Insuloj, Monako, Panamo, Paragvajo, Peruo, Sirio, Sudano, Turkio kaj Venezuelo.

Inter la individuaj subskribintoj troviĝis unu prezidento de respubliko (Vincent Auriol, antaŭa Prezidento de Francio), 4 ĉefministroj (de Nederlando, Aŭstrio, Pollando kaj Ĉeĥoslovakio), 405 membroj de

parlamentoj, 1.607 lingvistoj, 5.262 universitataj profesoroj kaj aliaj scienculoj, 40.000 geinstruistoj de mezgradaj kaj elementaj lernejoj, 1.228 edukaj fakuloj, 1.519 ĵurnalistoj, 5.113 kuracistoj, 211.734 juristoj, inĝenieroj, farmaciistoj kaj konstruistoj, 284.512 komercistoj, pli ol 200.000 diversaj metiistoj, pluraj dekmiloj da diversfakaj laboristoj.

Inter la organizaĵoj, kiuj subskribis la Deklaracion, troviĝis ankaŭ Sindikata Asocio de Okcidenta Germanio, Aŭstria Popola Partio, Federacio de Fervojaj Laboristoj de Japanio, Norvega Federacio de Laboro, Japana Unio de PTT-Laboristoj, Japana Unio de Ministoj. En Norvegio la Deklaracion entute subskribis 53 organizaĵoj, en Brazilo 16 organizaĵoj, en Japanio 140 organizaĵoj.

La 2-an de aŭgusto 1950 delegacio de UEA, sub la gvido de D-ro W. Solzbacher, transdonis la Deklaracion al Unuiĝintaj Nacioj en Lake Success. En la nomo de Unuiĝintaj Nacioj la Deklaracion akceptis Benjamin A. Cohen, la tiama Helpa Ĝenerala Sekretario. Kelkajn tagojn poste, la 8-an de aŭgusto, la Sekretariato de UN transdonis ĝin al la Sekretariato de Unesko en Parizo kiel kompetenta internacia specialigita organizaĵo por pritrakti tiun ĉi demandon.

22.3.2 Sepa Sesio de la Ĝenerala Konferenco (1952)

En la komenco la Sekretariato de Unesko entreprenis nenion. Okazis korespondado inter la reprezentantoj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj la Sekretariato; poste ankaŭ personaj renkontiĝoj. Pro la formo, en kiu la Peticio (Deklaracio) estis sendita de unu Sekretariato al la alia — preskaŭ privata letero de la tiama Helpa Ĝenerala Sekretario de UN al L. Elvin, tiam Ĉefo de la Departemento pri Edukado — ekestis duboj ĉu Unesko efektive estas ŝarĝita pri la afero en la senco de Regulo 10(c) de la Procedura Regularo de la Ĝenerala Konferenco, kiu preskribas, ke la provizora tagordo de iu sesio devas inkluzivi, interalie, ankaŭ punktojn proponitajn de UN konforme al Art. IV de la Interkonsento inter la du organizaĵoj. La Sekretariato de Unesko asertis en la komenco, ke la Peticio ne estis oficiale transdonita al Unesko kaj ke, sekve, Unesko ne estas ŝarĝita pri la afero. UEA insistis, ke la Peticio estis oficiale transdonita al la Sekretariato de UN, kiu siavice transdonis ĝin al Unesko kun la celo, ke Unesko pritraktu la aferon kaj certe ne por ke la Peticio estu konservita en la arkivo de tiu organizaĵo. UEA ankaŭ atentigis, ke, eĉ se oni akceptus la interpreton, laŭ kiu UN ne faris konkretan proponon en la senco de la menciita regulo, aŭ la Ĝenerala Direktoro aŭ la Ekzekutiva Komitato de Unesko povas facile enmeti la Peticion en la tagordon de la Ĝenerala Konferenco konforme al Reguloj 10(f) kaj (g). Post longaj traktadoj la Sekretariato enmetis en la Provizoran Projekton de Programo por 1953 kaj 1954 la sekvan

rezolucion (Rezolucio 4.124):

> La Ĝenerala Direktoro estas rajtigita entrepreni studon de la problemoj, kiujn starigas la diverseco de lingvoj por la intelektaj kaj moralaj rilatoj inter la popoloj, kaj de la rimedoj por faciligi la solvon de tiaj problemoj.

La Ekzekutiva Komitato pritraktis tiun punkton la 27-an de marto 1952. Ĝi decidis, ke ne estis ĝia tasko meti tian rezolucion en la provizoran programon de Unesko antaŭ ol la Ĝenerala Konferenco faris principan decidon pri traktado de tia kategorio de problemoj. Tial la Ekzekutiva Komitato instrukciis la Ĝeneralan Direktoron „prepari specialan raporton por prezenti tiun ĉi principan demandon al la Sepa Sesio de la Ĝenerala Konferenco".

Konforme al tiu decido, la reviziita tagordo de la Sepa Sesio enhavis la punkton 8.4.3.7 Raporto pri la Problemo de Universalaj Lingvoj en la Programo de Unesko. Kiel oni vidas, la Ekzekutiva Komitato ne faris el la Petskribo apartan punkton de la tagordo de la Ĝenerala Konferenco. Male, ĝi starigis al la Ĝenerala Konferenco la demandon ĉu entute Unesko okupiĝu pri „la problemoj, kiujn starigas la diverseco de lingvoj por la intelektaj kaj moralaj rilatoj inter la popoloj, kaj de la rimedoj por faciligi la solvon de tiaj problemoj". En la Dok. 7C/PRG/11 de la 22-a de aŭgusto 1952, rilatanta al la punkto 8.4.3.7 de la tagordo, en kiu estis prezentita la graveco de la problemoj, kiuj obstaklas la vojon al pli bona internacia kompreniĝo pro la multnombreco de lingvoj parolataj de diversaj popoloj", la Peticio estis menciita nur per kelkaj linioj, kvankam, efektive, ĝuste la Peticio estis la kaŭzo, ke tiu punkto entute troviĝis en la tagordo.

Tiamaniere la Peticio eniris nur kiel ereto en tiun tre larĝan ĝeneralan lingvan problemon. Tial, en la komenco, la Peticio estis nerimarkita, ĉar iel kaŝita inter multaj linioj de unu dokumento, kiu, siavice, prezentis nur ereton en la amaso da dokumentoj troviĝantaj antaŭ la Ĝenerala Konferenco okaze de ĝia Sepa Sesio.

Necesas aldoni, ke por la studo de tiu ĉi vasta problemo ne estis antaŭviditaj en la projekto de la buĝeto la necesaj financaj rimedoj kaj ke, laŭ la asertoj en la menciita dokumento, la Sekretariato de Unesko havis „nek rimedojn nek specialistojn, necesajn por iniciati ampleksan studon de la problemo".

El tiuj faktoj klare sekvas, ke la Ekzekutiva Komitato deziris ricevi negativan respondon de la Ĝenerala Konferenco, kio samtempe signifus silentan likvidon de la Peticio. Sendube, kaj en la Sekretariato kaj en la Ekzekutiva Komitato troviĝis klarvidaj personoj, kiuj komprenis la gravecon de la lingva obstaklo al internacia kompreniĝo,

sed, same kiel siatempe en la Ligo de Nacioj, troviĝis ankaŭ signifaj fortoj, kiuj — ĉu pro miopeco, ĉu pro antaŭjuĝoj aŭ aliaj kaŭzoj — rilatis negative al serioza pritrakto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj al racia solvo, kiun prezentas la politike neŭtrala Internacia Lingvo. Aliflanke, eĉ la membroj de la Ekzekutiva Komitato, kiuj havis negativan sintenon al la Peticio, ne povis neglekti ĝin, se ne pro aliaj kaŭzoj, do pro la fakto, ke ĝin subskribis preskaŭ 900.000 unuopuloj kaj reprezentantoj de 492 organizaĵoj, kiel rekonite en Dok. 7C/PRG/11 de Unesko mem.

La Sepa Sesio de la Ĝenerala Konferenco okazis en Parizo de la 12-a de novembro ĝis la 10-a de decembro 1952. Pro la fakto, ke UEA iniciatis la Peticion kaj tial reprezentis en tiu ĉi afero ĉiujn subskribintojn, la Ĝenerala Konferenco ĉiuvoĉe decidis la 19-an de novembro, ke du observantoj de UEA estu allasitaj. En tiu funkcio Prof. D-ro I. Lapenna ĉeestis la Ĝeneralan Konferencon ekde ĝia komenciĝo ĝis la 2-a de decembro, dum la alia observanto, E. Durrant, estis tie de la 19-a de novembro ĝis la 3-a de decembro.

La unua tasko de la observanto de UEA estis klarigi al la Sekretariato, ke en la menciita dokumento 7C/PRG/11 troviĝas pluraj gravaj eraroj pri faktoj, precipe rilate la demandon de komuna lingvo antaŭ la Ligo de Nacioj. Dank' al tiu interveno la Sekretariato korektis la erarojn en la dokumento 8C/PRG/11/Corr. de la 22-a de novembro 1952.

Okaze de la Pariza Sesio, la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) eldonis apartan dokumenton RDC/3 en 600 ekzempleroj, en kiu estis plej koncize prezentitaj la ĉefaj atingoj de Esperanto. Tiun dokumenton ricevis ĉiuj delegitoj. Dum personaj kontaktoj inter la reprezentantoj de diversaj delegacioj kaj la observantoj de UEA estis donitaj pliaj informoj kaj rilate la tiaman pozicion de Esperanto en la mondo kaj koncerne la Peticion. La 18-an de novembro okazis publika debatvespero en granda salono proksime al la tiama sidejo de Unesko. La celo de tiu aranĝo estis montri al la delegitoj la funkciadon de Esperanto kiel lingvo de debatoj. La temo estis: La Problemo de la Lingvo en Intelektaj Internaciaj Rilatoj. Prezidis Generalo L. Bastien (Francio). La diskuton partoprenis ses personoj apartenantaj al ses nacioj kun malsamaj naciaj lingvoj. La debatvesperon ĉeestis ĉ. 70 delegitoj, inter kiuj la reprezentantoj de la delegacioj de Aŭstrio, Svislando, F.R. Germanio, Hindio, Usono, Nederlando. Ĉeestis ankaŭ kelkaj altrangaj oficistoj de la Sekretariato. La debatvespero lasis profundan impreson: ĝi klare montris la plenan taŭgecon de la Internacia Lingvo ankaŭ por debatoj similaj al tiuj, kiujn spertas la Ĝenerala Konferenco.

La dokumento 7C/PRG/11 ne entenis proponon de rezolucio, kiel

tio okazis rilate aliajn punktojn de la tagordo. Tio signifis, ke iu el la delegacioj devis fari konkretan proponon. La 27-an de novembro Prof. I. Lapenna faris mallongan paroladon en la Programkomisiono, en kiu li prezentis la starpunkton de UEA kaj de la subskribintoj de la Peticio koncerne tiun ĉi demandon. En tiu parolado la observanto de UEA sugestis ankaŭ koncizan tekston de rezolucio, kiel vidiĝas el dokumento 7C/PRG/SR.9(Prov.) de la 1-a de decembro 1952.

Kompreneble, observantoj de neregistaraj organizaĵoj (NROj) sendube rajtas sugesti solvojn, sed tiuj sugestoj ne egalas al proponoj de delegacioj, surbaze de kiuj la Ĝenerala Konferenco faras decidojn. La 1-an de decembro la svisa delegacio prezentis al la Ĝenerala Konferenco la sekvantan projekton de rezolucio:

> La Ĝenerala Konferenco de Unesko
> *Konsiderante,*
> (a) ke Internacia Peticio favore al Esperanto, subskribita de 492 organizaĵoj kun entute 15,454.780 membroj kaj de 895.432 individuaj personoj, estis prezentita al Unuiĝintaj Nacioj kaj transdonita fare de la Sekretariato de tiu organizaĵo al la Sekretariato de Unesko;
> (b) ke Unesko havas ĉian kaŭzon atenti al la rezultoj atingitaj per Esperanto por la evoluigo de la intelektaj kaj moralaj rilatoj inter la popoloj, *invitas* la Ĝeneralan Direktoron komuniki la Petskribon al la Ŝtatoj-Membroj kaj entrepreni, en la kadro de la regulaj aktivadoj de la Sekretariato, la necesajn preparlaborojn por ebligi al la Ĝenerala Konferenco decidi, dum sia Oka Sesio, pri la sekvoj donotaj al tiu ĉi Peticio.

La voĉdono pri la supra projekto de rezolucio okazis unue en la Laborgrupo pri Kulturaj Aktivadoj, kiu konsistis el 20 ŝtatoj, inter kiuj Britio, Francio, Usono, Hindio, Norvegio, Svedio. Tie ĝi estis unuanime akceptita la 3-an de decembro. Poste ĝin akceptis la Program-komisiono kaj, fine, la 11-an de decembro la Pleno de la Ĝenerala Konferenco. Inter la 3-a kaj 11-a de decembro la Sekretariato faris en la Svisa Rezolucio redaktajn ŝanĝojn, tiel ke la fina teksto, adoptita la 11-an de decembro 1952, estas:

> 4.16 La Ĝenerala Direktoro estas rajtigita komuniki al Ŝtatoj-Membroj la Internacian Peticion favore al Esperanto, kiu estis prezentita al Unuiĝintaj Nacioj kaj transdonita de tiu Organizaĵo al Unesko, kaj entrepreni, konforme al komentoj ricevotaj, la necesan preparlaboron por ebligi al la Ĝenerala Konferenco decidi, dum la Oka Sesio, pri la agoj entreprenotaj je tiu ĉi Peticio.

Se oni komparas la originalan svisan proponon kun la fine akceptita teksto, oni facile rimarkas, ke estas ellasitaj la konsideroj kun la koncizaj informoj pri la impona nombro da subskribintoj. Tiu ellaso,

tamen, neniel tuŝis la esencan celon, nome ke Unesko fine estis devigita okupiĝi pri la afero.

22.3.3 Preparlaboroj de la Sekretariato kaj de UEA (1952-1954)

Plenumante la Rezolucion 4.16 de la Ĝenerala Konferenco, la Aganta Ĝenerala Direktoro, en cirkulera letero CL/720 de la 9-a de februaro 1953, komunikis la tekston de la Peticio al la Ŝtatoj-Membroj, samtempe petante ilin doni al li informojn kaj esprimi opiniojn pri la sekvoj donotaj al la Peticio. La Aganta Ĝenerala Direktoro speciale deziris informiĝi pri la instruado kaj uzo de Esperanto en diversaj landoj, pri la rezultoj atingitaj kaj pri la agadoj, kiuj, laŭ la opinio de la Ŝtatoj-Membroj, devus esti entreprenitaj.

La sekvan tagon, la 10-an de februaro 1953, CED siavice dissendis al ĉiuj landaj asocioj kaj al ĉiuj kunlaborantoj en la t.n. Unesko-Afero la dokumenton CED/INT./1 kun la titolo „Sugestoj Koncerne Kunmetadon de Raportoj pri Esperanto". En la dokumento estis mallonge prezentita la signifo de la Pariza Rezolucio kaj estis donitaj detalaj konsiloj pri la maniero, laŭ kiu devus esti kunmetitaj la raportoj pri Esperanto al la landaj kompetentaj instancoj. Surbaze de tiu dokumento, kiel ankaŭ de rekta korespondado inter CED kaj la kunlaborantoj en diversaj landoj, estis kunmetitaj multaj raportoj pri la Esperanto-Movado el vidpunkto de la koncernaj landoj. Entute 18 kunlaborantoj faris tiajn raportojn pri siaj respektivaj landoj. La raportoj, kiuj kune ampleksis plurajn centojn da paĝoj, estis transdonitaj al la landaj Unesko-Komisionoj, al ministerioj pri edukado kaj al aliaj instancoj. Po unu ekzemplero de la raportoj estis sendita ankaŭ al la Sekretariato de Unesko kune kun la respondoj de la Ŝtatoj-Membroj.

Siaflanke la Centro de Esploro kaj Dokumentado faris specialan raporton pri la Esperanto-Movado en la tuta mondo. La raporto donis koncizan bildon pri ĉio, kio estis kreita en la Internacia Lingvo aŭ pere de ĝi dum ĝia 66-jara ekzistado. Ĝi havis 50 dense tajpitajn paĝojn kaj pli ol 200 paĝojn da aldonaj dokumentoj kaj statistikaj tabeloj. La 21-an de novembro 1953 la raporto estis sendita al la Sekretariato de Unesko, laŭ ĝia peto.

Konscia, ke la plej impona kaj plej efika dokumento pri la kultura signifo de Esperanto estas la Esperanta literaturo, CED ekde la komenco planis organizon de granda ekspozicio en Montevideo dum la Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco. Interkonsente kun la Urugvaja Esperanto-Societo, CED prizorgis la necesajn preparlaborojn, skizis la planon de la estonta ekspozicio kun precizaj indikoj pri la fakoj, kiujn ĝi havos. En Montevideo mem estis formita Orga-

niza Komitato sub la gvido de Prof. M. Fernández-Menéndez kaj la kasisto Rodolfo García.

Alia grava paŝo estis la letero de la 27-a de junio 1953, per kiu UEA petis de Unesko la pozicion de organizaĵo en konsultaj rilatoj kaj tiucele aldonis la necesan dokumentaron.

Fine, estas menciinde, ke la Fako pri Eksteraj Rilatoj de UEA invitis la Sekretariaton de Unesko sendi observanton al la 38-a UK de Esperanto en Zagreb. Fakte, alta funkciulo de Unesko, Pierre Lebar, ĉeestis tiun kongreson en la nomo de Unesko.

Paralele kun la menciitaj ĉefagadoj evoluis la aktivado sur la kampo de informado al la larĝa publiko. Pere de la Bulteno de Internacia Gazetara Servo (IGS) kaj precipe per sendado de modelaj artikoloj al la kunlaborantoj en diversaj landoj, la Informa Fako de UEA sukcesis aperigi en gazetoj kaj revuoj de la mondo pli ol 1.500 artikolojn kaj informojn nur pri la pritrakto de Esperanto fare de Unesko.

La 1-an de junio 1954 la Sekretariato de Unesko publikigis dokumenton 8C/PRG/3 kun la titolo *Raporto pri la Internacia Peticio Favore al Esperanto* en la lingvoj angla, franca kaj hispana. Tiu dokumento entenas, interalie, resumon de la respondoj, kiujn donis 45 Ŝtatoj-Membroj al la peto de la Sekretariato. Kelkaj el la respondoj estis simplaj konfirmoj de ricevo, dum la aliaj povas esti dividitaj en tri grupoj: naŭ ŝtatoj deklaris, ke ili ne povas esprimi kian ajn opinion pro manko de spertoj kaj scioj; dek naŭ ŝtatoj esprimis sin kontraŭ kian ajn favoran sekvon al la Peticio, kaj naŭ el ili opiniis nedezirinda ĉian ajn kuraĝigon de „artefarita lingvo"; sed dek aliaj ŝtatoj respondis, ke agadoj favore al la Peticio devus esti entreprenitaj. La naŭ plej negativaj respondoj estis tiuj de Germanio, Cejlono, Danlando, Nederlando, Filipinoj, Svedio, Siamo, Sudafriko kaj Vjetnamo. Plej favore esprimis sin Aŭstrio, Kamboĝo, Kubo, Hispanio, Gvatemalo, Honduraso, Libano, Meksikio kaj Jugoslavio. Aŭstrio, Norvegio kaj Honduraso eĉ deklaris sin pretaj enkonduki la lingvon en la lernejojn sub difinitaj kondiĉoj. Tre malfavora estis la respondo de Usono. La Raporto de la Sekretariato enhavas, plue, tripaĝan aldonon pri la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-Movado, kiel ankaŭ partojn de la Rezolucio akceptita de la 38-a UK de Esperanto en Zagreb.

Jam antaŭ tio estis decidite, ke la 39-a UK de Esperanto en Haarlem pritraktos en du ĝeneralaj kunsidoj la temon „La Internacia Lingvo antaŭ Unesko". Por ke la diskutoj estu fruktodonaj, necesis fari ampleksajn preparojn kun la celo kolekti opiniojn de edukaj kaj sciencaj institucioj, kiel ankaŭ de elstaraj personoj de la publika vivo en diversaj landoj, pri la kultura kaj politika aspektoj de la

diskutota temo. CED sendis al la landaj asocioj en marto 1954 cirkuleron kun konsiloj pri la maniero fari la enketon kaj kun precizaj demandoj al la enketotaj institucioj kaj unuopaj personoj. La enketo, sukcese farita en Nederlando, Italio, Jugoslavio, Sarlando kaj Francio, montris la pozicion de Esperanto en la publika opinio de kelkaj landoj. La informoj, havigitaj pere de la enketo, ebligis al la Kongreso en Haarlem pritrakti pli profunde la temon kaj speciale la karakteron de la dokumento 8C/PRG/3. Montriĝis, ke la dokumento postulas plurajn korektojn kaj kompletigojn. Tial la kongreso ĉiuvoĉe akceptis Memorandon, kiu poste estis transdonita al la Ĝenerala Direktoro de Unesko. La Memorando estis publikigita de la Sekretariato de Unesko kiel dokumento 8C/PRG/3Add. en la angla, franca kaj hispana. Tiamaniere la antaŭa dokumento de Unesko (8C/PRG/3) estis korektita kaj kompletigita.

Kelkajn tagojn antaŭ la komenciĝo de la Oka Sesio en Montevideo estis finpretigita la dokumento CED/4 (en naciaj lingvoj RDC/4) kun la titolo *La Internacia Lingvo kaj la Kontribuo de la Esperanto-Movado al la Celoj de Unesko.* Al la dokumento estis aldonita la Rezolucio de la 39-a UK. Ĉiu ĉapitro komenciĝas per citaĵo el la Konstitucio de Unesko aŭ el ĝia Baza Programo, kaj poste sekvas la kontribuo de la Esperanto-Movado al ĉiu el tiuj specialaj taskoj. CED/4 estis eldonita en la franca lingvo en 400 ekzempleroj, en la angla en 500 ekzempleroj, en la hispana en 5.000 ekzempleroj. Ĝi estis poste distribuita al ĉiuj delegitoj en la Konferenco en Montevideo.

Ĉiuj menciitaj preparlaboroj estis finitaj antaŭ novembro 1954, kiam komenciĝis en Montevideo la Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco. Necesas aldoni, ke, konforme al decido de la Ekzekutiva Komitato, la Ĝenerala Direktoro invitis UEA sendi observanton al la Oka Sesio. Tiun taskon ricevis Prof. D-ro I. Lapenna.

22.3.4 Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco (1954)

La Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco okazis en Montevideo (Urugvajo) en *Palacio Legislativo* de la 12-a de novembro ĝis la 10-a de decembro 1954. La Ekzekutiva Komitato (Plenuma Komitato) kunvenis pli frue. Ĉiuj sepdek du Ŝtatoj-Membroj estis reprezentitaj. Estas utile mencii, ke ekde la Sepa Sesio (1952) la nombro de Ŝtatoj-Membroj konsiderinde altiĝis. Inter la aliaj, Soveta Unio kaj pluraj orienteŭropaj landoj aliĝis al Unesko.

Antaŭ la Ĝenerala Konferenco troviĝis du sendependaj demandoj en ligo kun Esperanto. Unu estis la peto de UEA koncerne la konsultajn aranĝojn; la alia rilatis al la Peticio.

En siaj respondoj al la letero de la Sekretariato de la 27-a de aprilo 1954 (CL/915) rilate la petskribojn de 17 NROj por establo de konsultaj rilatoj, Svedio kaj Britio apogis la peton de UEA, dum la aliaj Ŝtatoj-Membroj informis la Ĝeneralan Direktoron, ke ili ne havas komentojn. La Ekzekutiva Komitato pritraktis tiun ĉi demandon la 5-an de novembro. Prof. J. Nielsen (Danlando) kontraŭis la peton de UEA kaj B. Barbey (Svislando) apogis lin, dum Prof. H. Laugier (Francio), D-ro V. Veronese (Italio), poste Ĝenerala Direktoro de Unesko, kaj D-ro G. A. Raadi esprimis sin favore. Post mallonga diskuto la Ekzekutiva Komitato decidis per 8 voĉoj kontraŭ 2 rekomendi la Asocion por konsultaj aranĝoj. La Komisiono pri Administrado — unu el la du grandaj komisionoj, en kiuj estas reprezentitaj ĉiuj Ŝtatoj-Membroj — diskutis pri la demando la 25-an de novembro kaj ĉiuvoĉe decidis konsenti al UEA la konsultajn aranĝojn. La 8-an de decembro la Pleno de la Ĝenerala Konferenco, aprobante ĉiuvoĉe la Raporton de la Komisiono pri Administrado, samtempe aprobis ĝian decidon koncerne la konsultojn rilatojn. Tiamaniere establiĝis daŭraj, firmaj rilatoj inter Unesko kaj UEA. Pri la signifo de tiu decido v. sube en 22.3.5.

La situacio rilate la Peticion estis tute alia. La afero ja troviĝis en la tagordo kiel punkto 8.4.4.1 en Sekcio III (Komisiono pri la Programo kaj Buĝeto, nome la alia granda komisiono, en kiu estas reprezentitaj ĉiuj Ŝtatoj-Membroj), sed nek la Ĝenerala Direktoro, nek kiu ajn Ŝtato-Membro estis proponinta projekton de rezolucio antaŭ la komenciĝo de la Konferenco. Kiel jam dirite, neniu decido povas esti farita sen propono de rezolucio, prezentita ĝustatempe. Konsiderante la fakton, ke dek ŝtatoj estis prenintaj pozitivan starpunkton en siaj skribaj respondoj al la Sekretariato, kaj ke en Montevideo mem pluraj aliaj delegacioj esprimis sin favore pri la Internacia Lingvo en konversacioj kun la observanto de UEA, oni povis atendi ke iu el la delegacioj pretos iniciati la aferon dum la Konferenco mem.

Je la dispono de la Konferenco troviĝis la menciitaj dokumentoj 8C/PRG/3 kaj 8C/PRG/3Add. (kun korektoj de 8C/PRG/3), eldonitaj de la Sekretariato. Aliflanke, la delegitoj ricevis diversajn dokumentojn, publikigitajn de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, inter kiuj aparte grava estis la dokumento RDC/4 kun koncizaj informoj pri la Internacia Lingvo kaj pri la kontribuo de la Esperanto-Movado al la celoj kaj idealoj de Unesko. Siavice, la observanto de UEA, kiu ĉeestis la Konferencon de la komenco ĝis la fino, povis doni multajn aldonajn informojn rilate detalojn al preskaŭ ĉiuj delegacioj. Aparte gravan rolon havis la Universala Ekspozicio de Esperanto en la Instituto J. Batle y Ordónes en la tuja proksimeco de *Palacio Legi-*

stativo. Prof. M. Fernández-Menéndez malfermis la Ekspozicion la 17-an de novembro en la ĉeesto de pli ol 200 invititaj gastoj, inter kiuj troviĝis la reprezentantoj de la Prezidanto de la Nacia Konsilantaro de Urugvajo Don Andrés Martinez-Trueba, la Ministro de Edukado, la Urbestro de Montevideo, pluraj konataj edukistoj de Urugvajo, verkistoj kaj artistoj. Prof. Jean Thomas, tiam Ĉefo de la Departemento pri Kulturaj Agadoj, kaj L. Elvin, tiam Ĉefo de la Departemento pri Edukado, partoprenis en la nomo de la Sekretariato. Pluraj delegacioj sendis reprezentantojn al la inaŭgura ceremonio, kaj ankaŭ poste unuopaj delegitoj vizitis la Ekspozicion, kiu restis malfermita por la delegitoj kaj por la publiko ĝis la 12-a de decembro. Pri ĝi aperis longaj raportoj en la urugvaja gazetaro. Ĉ. 400-500 personoj ĉiutage vizitis ĝin, kio superis la nombron de vizitantoj de ĉiuj 8 ekspozicioj pri diversaj temoj, organizitaj de Unesko mem.

Ne estas eble neglekti la rolon de la publika opinio. La urugvaja gazetaro multe skribis pri la Peticio kaj publikigis plurajn artikolojn pri la Internacia Lingvo. La radio de Montevideo faris la samon. Amaso da informoj kaj artikoloj en ligo kun la Peticio aperis ankaŭ en gazetoj kaj periodaĵoj de aliaj landoj. Gazeteltranĉaĵoj alvenadis ĉiutage el ĉiuj partoj de la mondo. Spaco de ĉ. 20-25 kvadrataj metroj estis rezervita por ili en la ekspozicia halo, kaj fine de la Konferenco tiun spacon kovris ĉ. 1.500 eltranĉaĵoj en plej diversaj lingvoj.

Inter la delegitoj, kiuj vizitis la Ekspozicion, troviĝis ankaŭ s-ino Vallarta, membro de la Delegacio de Meksikio. Ŝia entuziasmo kreskis de unu fako al la alia. Jam antaŭ la vizito ŝi estis trastudinta la dokumenton RDC/4 en la hispana. En la Ekspozicio ŝi povis vidi grandan parton de tio, kion ŝi legis en la dokumento. Rezulte de tiu vizito la Meksikia Delegacio, post mallonga kunsido de la 2-a de decembro, decidis proponi tre objektivan kaj realecan Projekton de Rezolucio.

La Komisiono pri Programo kaj Buĝeto (en plua teksto Programkomisiono) pritraktis la aferon la 4-an de decembro, tre malfrue en la vespero. La Sekretario de la Komisiono anoncis la punkton pri la Peticio. Estus normale, ke post tio la parolon ricevu aŭ la delegito de Meksikio, aŭ la observanto de UEA, kiu en tiu ĉi kazo reprezentis la subskribintojn de la Peticio. Kvankam la observanto de UEA tuj levis la manon kaj, fakte, estis informinta la prezidanton de la Komisiono pri sia deziro paroli kaj kelkajn tagojn antaŭe kaj tuj antaŭ la komenciĝo de tiu kunsido, la prezidanto donis la parolon al Prof. Blinkenberg (Danlando). Prof. Blinkenberg lanĉis senrespondecan atakon kontraŭ Esperanto. Interalie li diris, ke Esperanto havas malriĉan vortaron kaj primitivan sintakson, ke en tiu lingvo oni eble povas esprimi la urugvajajn menuojn, sed ke ĝi ne

povas servi por la literaturo, nek entute por kulturaj celoj. Sian intervenon li faris en tre neserioza tono kun la celo provoki ridojn. Li spicis ĝin per kelkaj „spritaĵoj", je kiuj povis reagi per ridoj nur kompletaj ignorantoj, kies konoj pri la afero ne estis pli larĝaj, nek pli profundaj, ol tiuj de la profesoro. Ŝajnas ke Prof. Blinkenberg estas unu el la maloftaj, kiuj legis la protokolojn de la siatempa Komisiono pri Intelekta Kunlaborado (v. supre en 22.2.5), ĉar li montris esence identan „konon de faktoj" kaj similan „sciencan objektivecon". Prof. Blinkenberg, do, eĉ ne estis originala.

En atmosfero de neseriozeco, kreita de Prof. Blinkenberg, la prezidanto donis la parolon al observanto de UEA kaj permesis al li paroli nur dum tri minutoj. Tio apenaŭ sufiĉis por diri, ke nenion oni povas diri. Pro la nekultura atako de Prof. Blinkenberg, la observanto de UEA devis en la lasta momento ŝanĝi la enhavon de la planita paroladeto. Li sukcesis restarigi atmosferon de kulturo kaj digno. Prof. Don Clemente Estable, delegito de Urugvajo, forte protestis pro la nedigna kaj malserioza interveno de Prof. Blinkenberg kaj donis plenan apogon al la Meksikia Projekto de Rezolucio. Prof. Sommerfeld (Norvegio) rekonis la valoron de Esperanto kaj ĝian disvastigitecon en la mondo. Li deklaris, ke li povus voĉdoni pri ĉiuj punktoj de la Projekto de Rezolucio rilatantaj al faktoj, sed li preferus ellasi la punkton (4), kiu tekstis: „La Ĝenerala Konferenco.... rekomendas al Ŝtatoj-Membroj kuraĝigi la uzon de Esperanto en maniero, kiun ili konsideras la plej taŭga". Tial, li diris, li voĉdonos kontraŭ la Rezolucion en ĝia nuna formo. Post tio la prezidanto voĉdonigis la Rezolucion. La rezulto estis: 3 delegacioj (Meksikio, Urugvajo kaj Ĉinio) voĉdonis por, 23 estis kontraŭ, 19 sin detenis. La propono de Meksikio, do, estis rifuzita. Tutcerte voĉdonis kontraŭ: Svedio, Norvegio, Francio, Belgio, Danlando, Nederlando, Svislando, Usono, Britio, Egiptio, Kubo, Grekio. Certe sin detenis Soveta Unio, Pollando, Belorusio, Ukrajno, Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio. Ne estas eble diri kiel voĉdonis la aliaj delegacioj. La kontrolo estas malfacila, ĉar oni voĉdonas per levado de la manoj kaj tio daŭras nur kelkajn sekundojn. Nenie estas eksplicite notataj la delegacioj, kiuj voĉdonas por aŭ kontraŭ iu propono, aŭ sin detenas, krom en kazoj de laŭnoma voĉdonado.

En la fino de tiu kunsido la observanto de UEA parolis ankoraŭfoje kaj insistis pri tio, ke la Komisiono almenaŭ akceptu la Raporton 8C/PRG/3 de la Sekretariato. Kontraŭis Prof. Nielsen (Danlando), sed apogis D-ro Beeby (Novzelando). La Komisiono akceptis la starpunkton de la observanto de UEA kaj „prenis noton" pri tiu Raporto.

Vendredon, la 10-an de decembro, la Pleno de la Ĝenerala Konferenco en la matena kunsido ĉiuvoĉe akceptis la Raporton de la

Programkomisiono. La raportisto tute ne menciis la malakcepton de la Meksikia Rezolucio, sed nur sciigis, ke la Programkomisiono „prenis noton" de la Raporto 8C/PRG/3.

Pluraj faktoroj kontribuis al la rifuzo de la Meksikia Projekto de Rezolucio en la kunsido de la Programkomisiono la 4-an de decembro. Unu el ili sendube estis la atmosfero de neseriozeco intence provokita de la dana delegito, verŝajne unika evento en la historio de Unesko. La publika opinio de Urugvajo estis profunde ŝokita. Ĉiuj gazetoj raportis pri la nekredebla incidento kaj forte kritikis la manieron, laŭ kiu la Programkomisiono traktis la aferon. Unu el la plej fortaj kaj longaj kritikoj aperis en *El Debate* de la 7-a de decembro. Simile agis ankaŭ alia granda gazeto, *Tribuna Popular*. Unu post la alia la gazetoj informis la publikon pri la nekultura kaj kontraŭscienca interveno de Prof. Blinkenberg. Grandan indignon elvokis ankaŭ liaj rimarkoj pri la „urugvajaj menuoj". La observanto de UEA estis plurfoje intervjuita. Li ankaŭ faris paroladeton al la vasta publiko pere de unu el la radio-stacioj de Montevideo. Li esprimis kontenton pro la decido koncerne la konsultajn aranĝojn, sed kritike parolis pri la senrespondeca decido de la Programkomisiono. La publika opinio de Urugvajo kaj precipe de Montevideo ekondiĝis. Ĉiuj simpatioj estis je la flanko de kulturo, de justeco, de Esperanto.

Kompreneble, la dana delegito ne estus povinta atingi sian celon, se la nekutimaj cirkonstancoj ne estus helpintaj lin. El 72 delegacioj nur 45 ĉeestis la kunsidon de tiu varmega malfrua sabata posttagmezo, kiam ĉiuj, lacaj pro tuttagaj kunsidoj, senpacience sopiris al semajnfina ripozo. Plue, kun kelkaj esceptoj, eĉ la ĉeestantaj delegacioj ne estis reprezentitaj de siaj ĉefoj aŭ aliaj delegitoj kun la necesaj konoj pri la afero, sed de malpli altrangaj oficialuloj, kiuj apenaŭ komprenis pri kio fakte temas kaj, almenaŭ en kelkaj kazoj, eĉ ne konis la oficialan starpunkton de siaj propraj registaroj. Nur tio povas ekspliki, ke, ekzemple, la delegito de Kubo voĉdonis kontraŭ, aŭ ke la delegito de Jugoslavio sin detenis, kvankam Kubo estis oficiale informinta la Sekretariaton, ke „.... nia Registaro ĉiam rekomendis la adopton de Esperanto kiel helpa lingvo", dum la Jugoslavia Nacia Unesko-Komisiono estis espriminta la opinion, ke Esperanto „povas faciligi komunikadon inter la popoloj, kiel ankaŭ internacian kompreniĝon", kaj tial sugestis akcepton de rezolucio „laŭ kiu Unesko helpos la estontan progresigon de la Esperanto-Movado".

En tia situacio ne estis tre malfacile por la dana delegito diri kion ajn kaj kredigi kian ajn sensencaĵon.

Fine, kiel en la posta korespondado atentigis la observanto de UEA, estis faritaj du gravaj proceduraj eraroj: (i) la prezidanto ne invitis paroli la proponinton de la Projekto de Rezolucio, nek la ob-

servanton de UEA kiel reprezentanton de la subskribintoj, sed donis unue la parolon al la kontraŭanto de la Projekto de Rezolucio; (ii) la deklaro de la norvega delegito, ke li povus voĉdoni jese pri ĉiu punkto kun la escepto de la punkto (4), estis fakte amendo, kiu devis esti prenita en konsideron, sed tio ne okazis.

La subjektiva kaj nescienca traktado de la afero kaŭzis konsterniĝon en ĉiuj respondecaj rondoj ne nur en Unesko mem, sed ankaŭ vaste ekster ĝia kadro. Al tiu situacio kontribuis ankaŭ multnombraj personaj intervenoj kaj dokumentitaj leteroj de la observanto de UEA, de la prezidanto kaj sekretario de la Urugvaja Esperanto-Societo (Prof. M. Fernández-Menéndez kaj Prof. Victor Luis Cao), kiel ankaŭ de aliaj kunlaborantoj en Montevideo.

En la ŝanĝita atmosfero la delegacio de Meksikio, apogita de Urugvajo kaj de kelkaj aliaj, decidis postuli rekonsideron de la Projekto de Rezolucio en la Pleno. La Projekto de Rezolucio estis amendita per ellaso de la punkto (4) konforme al la sugesto de la norvega delegito en la Programkomisiono (v. supre). En la nova teksto la punkto (5) fariĝis punkto (3) kaj punkto (3) fariĝis punkto (4).

La amendita Projekto de Rezolucio estis prezentita en la lasta kunsido de la Pleno, kiu okazis vendredon, la 10-an de decembro, posttagmeze. La granda salonego de *Palacio Legislativo* estis plenŝtopita. Ankaŭ en la galerioj ne troviĝis unusola libera loko. Eminentaj figuroj de la urugvaja publika vivo, el kiuj multaj estis subskribintaj la Peticion, ĉeestis. Ĉiuj Ŝtatoj-Membroj estis reprezentitaj kaj la delegacioj estis kompletaj. Don Justino Zavala-Muniz, la urugvaja Ministro de Edukado, prezidis. La ĉefo de la delegacio de Meksikio, Prof. Vallarta, legis la amenditan tekston kun profunda graveco kaj digno, eksplikis la amendon kaj prezentis siajn argumentojn. La ĉefo de la delegacio de Svislando, s-ro Bourgeois, kaj la brita delegito, Sir Ben Bowen Thomas, nun apogis la Projekton de Rezolucio. La Prezidanto voĉdonigis la novan tekston kaj la rezulto estis: 30 delegacioj voĉdonis jese, 5 nee, 17 sin detenis. La aliaj ne voĉdonis. Favore al la rezolucio certe voĉdonis Meksikio, Urugvajo, Svedio, Norvegio, Svislando, Nederlando, Luksemburgo, Francio, Brazilo, Britio, Italio, Grekio, Jugoslavio, Ĉinio, Aŭstrio, Honduraso, Israelo, Novzelando.... Kontraŭ la rezolucio certe voĉdonis Danlando, Egiptio kaj Kubo. Certe sin detenis Soveta Unio, Belorusio, Ukrajno, Pollando, Ĉeĥoslovakio kaj Hungario. Ankaŭ tiu ĉi voĉdono okazis per levo de manoj kaj tial ne estis eble establi kun plena certeco kiel voĉdonis la aliaj delegacioj.

La Rezolucio, akceptita de la Pleno de la Ĝenerala Konferenco la 10-an de decembro 1954, kiel ĝi aperas en la dokumento *Rezolucioj*

de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, Montevideo, 1954[6], tekstas:

Rezolucio

IV. 1.4.422 La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto;
IV. 1.4.4221 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;
IV. 1.4.4222 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;
IV. 1.4.4223 Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;
IV. 1.4.4224 Komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

La rezulton de la voĉdono salutis varma aplaŭdo de la granda plimulto de la delegacioj kaj, eĉ pli, de la ĉeestantoj en la galerioj. La urugvaja gazetaro kaj radio alportis la novaĵon jam la morgaŭan matenon. La taggazeto *Tribuna Popular* amplekse informis sub la titolo *„Triunfo de Esperanto"*. En la postaj tagoj praktike ĉiuj radiostacioj de la mondo kaj ĉ. 2.000 gazetoj kaj periodaĵoj sciigis pri tiu historia decido de la Ĝenerala Konferenco.

22.3.5 Signifo de la Decidoj kaj Iliaj Sekvoj

22.3.5.1 *Konsultaj Rilatoj.* — En la tempo, kiam estis establitaj la konsultaj rilatoj inter Unesko kaj UEA, nome ekde la 8-a de decembro 1954 ĝis 1961, tiuj rilatoj estis nomataj „konsultaj aranĝoj". Organizaĵo kun tiaj aranĝoj rajtis sendi, sen speciala invito, observanto(j)n al ĉiu sesio de la Ĝenerala Konferenco. Tia organizaĵo povis esti invitita sendi siajn specialistojn al kunvenoj, teknikaj konferencoj aŭ seminarioj rilatantaj al demandoj, kiuj ĝin interesas. Laŭ la cirkonstancoj, organizaĵo kun konsultaj aranĝoj povis sendi al tiaj kunvenoj kaj konferencoj sian opinion ankaŭ skribe. La aliaj rajtoj de organizaĵoj kun tiaj aranĝoj estis: la rajto ricevi ĉiujn dokumentojn kaj nekonfidencajn informojn de Unesko; la rajto sendi skribajn raportojn kaj sugestojn pri la programo de Unesko, kion la Ĝenerala Direktoro

6. Records of the General Conference, Eighth Session, Montevideo, 1954, *Resolutions,* Res. IV.1.4.422, p. 36.

devis diskonigi al la membroj de la Ekzekutiva Komitato, al la Ŝtatoj-Membroj kaj al la Ĝenerala Konferenco. Ĉiuj menciitaj rajtoj kaj privilegioj povis esti resumitaj je la fundamenta rajto esti konsultita en ĉiuj aferoj koncernantaj la kompetentecon kaj sferon de agado de la koncerna organizaĵo. En la kazo de UEA tio praktike signifis la rajton doni sian opinion pri ĉio, kio koncernas la lingvan demandon en internaciaj rilatoj.

Siavice, asocio kun konsultaj aranĝoj devis helpi, laŭ siaj eblecoj, la efektivigon de la programo de Unesko; inviti tiun organizaĵon sendi sian observanton al la kongresoj kaj konferencoj de la asocio; liveri al Unesko informojn pri siaj agadoj kaj sendi al ĝi siajn publikaĵojn kaj periodaĵojn; doni informojn al Unesko pri ĉiuj ŝanĝoj en la nombro de la membraro kaj pri la diversaj funkciuloj; sendi al Unesko ĉiujare raporton pri la menciitaj punktoj.

Kiel vidiĝas el la Raportoj de la Estraro, regule publikigataj en la *Jarlibro* de la Asocio, UEA ĉiam rigore observis siajn devojn kaj, se necese, energie postulis siajn rajtojn.

En 1960 la Ĝenerala Konferenco akceptis novan principaron pri la rilatoj kun neregistaraj organizaĵoj. Laŭ tiu principaro, entenata en la *Direktivoj Koncerne la Rilatojn kun Internaciaj Neregistaraj Organizaĵoj* (poste iom amenditaj de la 14-a Sesio en 1966), ĉiuj organizaĵoj, kiuj pli frue havis konsultajn aranĝojn, estis divididaj je tri kategorioj de konsultaj rilatoj: A, B kaj C. Nur tre limigita nombro da organizaĵoj, ĉefe tiuj kun duonŝtata karaktero aŭ fonditaj de Unesko mem, eniris la kategorion A. La plej gravaj internaciaj organizaĵoj troviĝas nun en la kategorio B, dum la malpli gravaj estas en la kategorio C. La grandega plimulto de internaciaj organizaĵoj troviĝas ekster kia ajn kategorio. Dank' al la efika kunlaborado de UEA kun Unesko ekde 1954, la Ekzekutiva Komitato de Unesko proponis al la Estraro de UEA la kategorion B, kaj la Estraro akceptis la proponon. Tio okazis en 1961 kaj, ekde tiam, UEA plu konservas tiun prestiĝan pozicion en la rilatoj kun Unesko. La kategorio A nun nomiĝas „konsultaj kaj asociiĝintaj rilatoj"; la kategorio B estas tiu de „informaj kaj konsultaj rilatoj"; la kategorio C estas nomata kategorio de „reciproka informado".

Konforme al la novaj Direktivoj, la organizaĵoj en kategorio B (informaj kaj konsultaj rilatoj) ricevas ĉiujn dokumentojn de Unesko; devas esti konsultitaj rilate la Programon kaj Buĝeton de Unesko; povas esti invititaj partopreni pere de siaj observantoj en la laboroj de diversaj kunvenoj organizitaj de Unesko; devas esti invititaj partopreni en la konferencoj de neregistaraj organizaĵoj; devas esti invititaj sendi observantojn al la Ĝenerala Konferenco kaj ĝiaj komisionoj; rajtas, kun la konsento de la koncerna prezidanto, fari

deklarojn en la komisionoj, komitatoj kaj aliaj organoj de la Ĝenerala Konferenco; povas, kun la aprobo de la Ĝenerala Komitato, alparoli la plenajn kunsidojn de la Ĝenerala Konferenco pri demandoj apartenantaj al ilia kompetenteco; povas ricevi subvenciojn por siaj publikaĵoj kaj konferencoj; rajtas prezenti skribajn deklarojn al la Ĝenerala Direktoro rilate tiujn punktojn de la programo, pri kiuj ili kompetentas, kaj la Ĝenerala Direktoro devas komuniki la esencon de tiuj deklaroj al la Ekzekutiva Komitato kaj, se necese, al la Ĝenerala Konferenco. Tiuj organizaĵoj havas ankaŭ aliajn rajtojn, sed same tiel adekvatajn devojn. Ekzemple, ili devas kontribui al la realigo de la programo de Unesko, inviti la reprezentantojn de Unesko al siaj kongresoj kaj konferencoj; raporti de tempo al tempo al la Ĝenerala Direktoro pri siaj agadoj.

Laŭ la plej lasta dokumento de Unesko (RMO/WS/87) de majo 1973, en kategorio A troviĝas 35 internaciaj organizaĵoj; en kategorio B estas 167 organizaĵoj; ĉiuj aliaj estas en kategorio C (144) aŭ tute ekster kategorio.

La nuna pozicio de UEA estas tre kontentiga kaj ĝi montras ankoraŭfoje, ke la Asocio ĝuas altan prestiĝon kaj ke ĝia laboro estas aprezata de la kompetentaj instancoj de Unesko.

22.3.5.2 *Rezolucio de 1954.* — Por bone kompreni la signifon de la Rezolucio, estas necese memori, ke Unesko estas interŝtata organizaĵo. Sekve, neniu organo de Unesko povas en kiu ajn formo altrudi siajn decidojn al la ŝtatoj, kiuj ankaŭ sur tiu ĉi kampo de edukado, scienco kaj kulturo estas suverenaj. Tial, se iu ajn iam ajn flegis eĉ nur reveton, ke Unesko povus, ekzemple, devige enkonduki la Internacian Lingvon en la lernejojn, tiu espero estis absolute nereala, ĉar Unesko tute simple ne havas tian povon. La Rezolucion, do, oni devas rigardi en tiu ĉi kadro de konstituciaj kaj faktaj eblecoj de Unesko.

Ĝuste tial la Rezolucio havas unuarangan principan karakteron. Ĝi ne parolas pri la eventualaj eblecoj por la estonteco, nek ĝi teoriumas pri la strukturo, kiun devus aŭ ne devus havi instrumento de internacia komunikado, sed ĝi tutsimple rilatas al Esperanto kiel socia fako. Ĝi rekonas, ke la rezultoj *jam atingitaj* sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko. Kaj tiuj celoj kaj idealoj, difinitaj en la Konstitucio kaj Baza Programo de Unesko, estas: defendo de la paco; pli bona kompreniĝo inter la popoloj; respektado de la Homaj Rajtoj; disvastigo de la kulturo kaj edukado; intelekta kaj morala solidareco de la homaro; interŝanĝo de ideoj, scioj kaj personoj; internacia kunlaborado sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo; venkado de malfacilaĵoj, kiujn kreas la diverseco de lingvoj; edukado al monda civitaneco; diskonigo de klasikaj kaj

nuntempaj verkoj per tradukoj; diskonigo de sciencaj scioj; faciligo de libera disvastigo de ideoj skribe, parole kaj bilde....

En la unuaj du punktoj la Rezolucio, do, oficiale rekonas, ke la rezultoj atingitaj per Esperanto kontribuis kaj kontribuas al la realigo de ĉiuj menciitaj esencaj kondiĉoj kondukantaj al pli granda unueco de la homaro kun samtempa respekto de la diferencoj. La lastaj du punktoj de la Rezolucio estas nur logika sekvo de la principa rekono, entenata en la unuaj du punktoj.

Per la Rezolucio de la 10-a de decembro 1954 estas por la unua fojo oficiale agnoskita la eduka, scienca kaj kultura valoro de la Internacia Lingvo. Tial, per si mem, ĝi signifas fortan rekomendon. En tio konsistas ĝiaj graveco kaj principa signifo.

22.3.5.3 *Kelkaj Sekvoj.* — La Rezolucio kaj la decido pri la konsultaj rilatoj, per si mem tre valoraj, havis ankaŭ multajn flankefikojn kaj postajn sekvojn.

La ĉefa flankefiko de ambaŭ decidoj, kiel ankaŭ de la tuta agado en ligo kun la Peticio, estis la amasa informado pri la Internacia Lingvo. Oni konsideru, ke ne nur preskaŭ 900.000 unuopuloj, inkluzive elstarajn personecojn de la publika vivo, kaj kvincento da organizaĵoj kun multmiliona membraro estis rekte kontaktitaj, sed ankaŭ la fakton, ke inter 1950 kaj 1955 miloj da artikoloj kaj sciigoj aperis en la monda gazetaro, dum aliajn centojn da informoj disaŭdigis diversaj radio-stacioj. Ankaŭ en la postaj jaroj la Rezolucio estis kaj plu estas ofte menciata en artikoloj, prelegoj kaj aliaj kuntekstoj. Dank' al la Peticio kaj la du decidoj, multaj milionoj da personoj ricevis informojn pri la Internacia Lingvo.

La Rezolucio sendube estis unu el la faktoroj, kiuj helpis la restarigon de la Esperanto-Movado en kelkaj landoj, en kiuj ĝis 1955 agado por Esperanto estis aŭ malebla aŭ grave malhelpata.

Unu el la rektaj rezultoj de la Rezolucio estis la decido de la Ekzekutiva Komitato de Unesko de la 15-a de novembro 1959, per kiu D-ro L. L. Zamenhof estis deklarita unu el la „grandaj personecoj de la Homaro". Efektive, en 1959 la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof estis solene memorigita en ĉiuj partoj de la mondo sub aŭspicio de multnombra kaj tre eminenta Internacia Patrona Komitato.

Pro la konsultaj rilatoj kun Unesko la Asocio povis akiri la pozicion de „konsultiĝoj" kun UN. En New York la lokaj reprezentantoj ĉe la Sekretariato de UN faris kaj plu faras ne nur grandan, sed ankaŭ tre utilan laboron. Preskaŭ ĉiusemajne ili ĉeestas la kunsidojn de NROj en la Sekretariato kaj ofte intervenas en ligo kun demandoj rekte aŭ nerekte tuŝantaj la lingvan demandon. Aliflanke, en Parizo la lokaj reprezentantoj de UEA ĉe Unesko havas rektajn

kontaktojn kun la Sekretariato, partoprenas la sesiojn de la Ĝenerala Konferenco, la kunvenojn de NROj kaj de iliaj laborgrupoj, donas abundan helpon al evoluigo de la eksteraj rilatoj de UEA. En Londono la reprezentanto de UEA kontaktas kun trideko da NROj situantaj tie. Rezulte de tiuj multjaraj agadoj, pri kiuj regule aperas informoj en la Estraraj Raportoj de UEA, estabiĝis diversaspektaj rilatoj ankaŭ kun multaj NROj. CED sendas al la Sekretariatoj de Unesko kaj UN, kiel ankaŭ al la Naciaj Unesko-Komisionoj, siajn dokumentojn, dum UEA regule komentas pri la programoj kaj buĝetoj de Unesko, kaj ofte intervenas en aferoj rilatantaj al lingvaj demandoj kaj aliaj celoj de la Asocio.

Estas menciinde, ke en 1957 kaj Unesko kaj UN eldonis siajn afiŝojn kun teksto en Esperanto. En la kadro de la konsultaj rilatoj estis lanĉita la Serio Oriento-Okcidento, kiu riĉigis la tradukan literaturon en Esperanto per rimarkindaj verkoj. En 1962 UEA eldonis, kun la financa helpo de Unesko, la verketon *Oriento kaj Okcidento al reciproka kompreno?* de Georges Fradier en traduko de C. D. A. Capp.

UEA partoprenis en ĉiuj grandaj kampanjoj de UN kaj Unesko, kiuj rilatis al tiu aŭ alia aspekto de ĝiaj celoj, ĉiufoje laŭ propra speciala laborplano kun emfazo je la lingva obstaklo kaj la rolo de Esperanto. Ekzemple, en 1965, okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro (JIK), la baza ideo estis, ke por realigi amasan internacian kunlaboradon necesas solvi la lingvan problemon per ĝeneraligo de la uzo de Esperanto en internaciaj rilatoj. La granda, tutmonda kampanjo de UEA rezultigis la Proponon al UN, pri kio aperas kelkaj detaloj en la sekvanta sekcio. En 1968 UEA grave kontribuis al la Jaro de Homaj Rajtoj (JHR). En sia agado ĝi dediĉis apartan atenton al la rekonita, sed neglektata rajto je lingva egaleco kaj, kunlige, al multnombraj formoj de lingva diskriminacio. Ĝia starpunkto vaste penetris en la mondon kaj fariĝis parto de la ĝenerala lukto kontraŭ kiun ajn formon de diskriminacio. En la Internacia Jaro de Edukado (1970) UEA diskonigis la edukan signifon de la Internacia Lingvo ĝenerale, sed kun emfazo je la eduka valoro de Esperanto-instruado en lernejoj. Jam en 1971, okaze de la Internacia Jaro de la Libro (1972), UEA intensigis la propagandon de la Esperanta literaturo kaj atingis kontentigajn rezultojn: en 1971 la aĉetado de Esperantaj libroj kreskis je ĉ. 50% kompare kun 1970, kaj en 1972 je pliaj 5% kompare kun la antaŭa jaro.

En 1971 UEA atingis plian principan sukceson. Jam en 1968 la reprezentantoj de UEA forlasis la Konferencon de NROj por montri sian proteston pro la malobservo de homaj rajtoj sur la lingva kampo. Ankaŭ post la forlaso de la Konferenco, UEA insistis pri sia starpunkto kaj ĝia protesta dokumento estis distribuita al ĉiuj NROj en

konsultaj rilatoj. Fine, la Konferenco de NROj, okazinta en oktobro 1971 en Parizo, ĉiuvoĉe akceptis la starpunkton de UEA. Laŭ la amendita Interna Regularo de la Konferenco, la franca kaj angla ja restas la du laboraj lingvoj, sed la delegitoj nun rajtas uzi ankaŭ kiun ajn alian lingvon, kondiĉe ke ili mem prizorgu la interpretadon en unu el la du laboraj lingvoj. Precize tiun rajton postulis UEA. Ekde nun nenio malhelpas, ke la reprezentantoj de UEA alparolu la Konferencon en la Internacia Lingvo konforme al la nova regulo.

La Rezolucio kaj la konsultaj rilatoj ĉiuflanke altigis la prestiĝon de la Internacia Lingvo kaj fortikigis la pozicion de UEA. Ambaŭ decidoj sendube plu helpos al disvastigo de Esperanto.

22.4 PROPONO AL UNUIĜINTAJ NACIOJ

22.4.1 Origino

Per sia Rezolucio A/RES/1844 (XVII) de la 19-a de decembro 1962 (distribuita la 11-an de januaro 1963) la Ĝenerala Asembleo de UN proklamis la jaron 1965, okaze de la 20-a datreveno de la fondiĝo de UN, Jaro de Internacia Kunlaboro (JIK). UEA akceptis la inviton de la Sekretariato de UN, poste ankaŭ de Unesko, kunlabori en la realigo de diversaj agadoj antaŭviditaj de UN por tiu jaro.

UEA tuj komencis la preparlaborojn. En aŭgusto 1964, dum la Universala Kongreso de Esperanto en Hago, la Komitato de la Asocio ĉiuvoĉe akceptis specialan Laborplanon por agadoj okaze de JIK. La Laborplano estis tuj sendita al ĉiuj landaj, fakaj kaj specialigitaj Esperanto-organizaĵoj. Ĝi estis ankaŭ publikigita en *Esperanto*, januaro 1965.

La kvarpaĝa dokumento konsistas el multaj punktoj, sistemigitaj en la Enkondukaj Rimarkoj kaj en la du ĉefaj partoj: Subteno al Agado de UN kaj La Lingva Problemo. En la enkonduko estis mallonge prezentitaj la celoj de JIK, la preparlaboroj de la Asocio, la Rezolucio de la UK en Hago kaj la decidoj de la Komitato. La unua parto rilatis al la taskoj de UEA, de ĉiuj ĝiaj organizaĵoj kaj individuaj membroj por kontribui al la ĉefa celo de JIK, nome al progresigo de kunlaboro inter ĉiuj popoloj, al internacia interkompreniĝo, al forigo de tensioj kaj al fortikigo de la monda paco. En la dua parto estis antaŭviditaj pluraj agadoj favore al la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kiel unu el la esencaj antaŭkondiĉoj por atingi internacian kompreniĝon. Konforme al punkto (v) de la dua parto, aparta plano estis ellaborita por agado en parlamentoj de diversaj landoj kun la celo interesigi al ili kaj, pere de ili, al la respektivaj registaroj la lingvan problemon.

La tuta multflanka agado evoluis laŭplane dum 1965 kaj, rilate la Proponon, parte ankaŭ en 1966, sur ĉiuj niveloj: internacia, landa, loka kaj faka-speciala. Centoj da Esperanto-organizaĵoj kaj pluraj miloj da unuopuloj en ĉiuj partoj de la mondo aktive kunlaboris. La ĉefaj rezultoj, vere imponaj, estas koncize prezentitaj en Ĉap. 18.3.3.4 de tiu ĉi libro[7].

La Universala Kongreso de Esperanto en Hago, kiun partoprenis 2.512 reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj kaj individuaj membroj el ĉiuj partoj de la mondo, per aklamo akceptis en la ferma kunsido de la 8-a de aŭgusto 1964 Rezolucion, per kiu ĝi decidis doni sian plenan apogon al la klopodoj de UN en JIK kaj samtempe atentigi pri la lingvodiverseco kiel unu el la plej gravaj obstakloj al plua intensigo kaj vastigo de internacia kunlaborado. La 12-an de aŭgusto 1964 la Rezolucio estis sendita al la Ĝenerala Sekretario de UN, kiu konfirmis la ricevon per la letero de la 21-a de aŭgusto.

La kompleta Kongresa Rezolucio, sed, kompreneble, kun ellaso de la enkonduka parteto, fariĝis la teksto de la Propono prezentota al UN. La Propono estis la kerno de la kampanjo sub la devizo: Jaro de Internacia Kunlaboro — Jaro de la Internacia Lingvo Esperanto. Interalie, ankaŭ glumarko kun la sama devizo estis eldonita en kelkaj dekmiloj da ekzempleroj kaj uzata dum 1965 sur la korespondaĵoj de UEA.

22.4.2 Amasa Apogo

En la fina redakto la Propono al UN okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro tekstas:

> Donante plenan apogon al la klopodoj de Unuiĝintaj Nacioj progresigi la kunlaboron inter la popoloj kun la celo dispeli internaciajn tensiojn kaj firmigi la mondan pacon; sed profunde konvinkitaj, ke la lingvodiverseco prezentas unu el la plej gravaj obstakloj al plua intensigo kaj vastigo de internacia kooperado sur ĉiuj niveloj; prenante en konsideron la Rezolucion de la 10-a de decembro 1954, per kiu la Ĝenerala Konferenco de Unesko rekonis „la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo";
> Ni nun proponas, ke Unuiĝintaj Nacioj solvu la lingvan problemon per efektiva kaj efika helpo al disvastigo de la neŭtrala Internacia

7. Pliaj detaloj troviĝas en la *Jarlibro* de UEA, Dua Parto, 1966, p-oj 46-49, kiel ankaŭ en la dokumento *Kontribuo de la Esperanto-Movado al la Jaro de Internacia Kunlaboro* (CED: I/VII/5 de la 1-a de aprilo 1966). Multaj aliaj informoj troviĝas preskaŭ en ĉiu numero de *Esperanto* por la jaroj 1964-1967.

Lingvo Esperanto, rekomendante ankaŭ al la Statoj-Membroj progresigi ĝian instruadon kaj stimuli ĝian uzon en la internaciaj rilatoj de la popoloj.

UEA eldonis en 205.000 ekzempleroj la folion kun la teksto de la Propono en Esperanto kaj en tri el la kvin oficialaj lingvoj de UN, nome en la angla, franca kaj hispana, krome nur kun Esperanta teksto kaj libera spaco por presigo de aliaj nacilingvaj tekstoj, tiel ke baldaŭ la Propono aperis ankaŭ en la rusa, nederlanda, sveda, dana, greka, germana, hungara, itala, japana, serba-kroata kaj multaj aliaj lingvoj. Ĉiu folio havis spacojn por 21 subskriboj kun precizaj indikoj pri la nomo, profesio aŭ okupo (por organizaĵoj: nombro da membroj) kaj adreso.

Laŭ la stato je la 25-a de januaro 1967 la nombro de individuaj subskribintoj estis 925.034 el 74 landoj, kaj tiu de organizaĵoj estis 3.846 kun entute 72,892.000 membroj [8].

Jen la nombro de individuaj subskribintoj laŭ la diversaj kategorioj: 114 Ŝtatestroj kaj Membroj de Registaroj de suverenaj ŝtatoj; 1.359 parlamentanoj; 1.008 lingvistoj kaj filologoj; 6.963 aliaj membroj de sciencaj akademioj, institutoj, esplorcentroj, profesoroj, docentoj kaj asistentoj en universitatoj; 52.363 instruistoj en mezgradaj, teknikaj, elementaj kaj aliaj lernejoj; 6.902 verkistoj, artistoj kaj ĵurnalistoj; 59.398 aliaj liberaj profesioj (kuracistoj, advokatoj, komercistoj, industriistoj, ktp.); 276.338 studentoj kaj lernantoj; 373.192 oficistoj (ŝtataj kaj privataj) kaj laboristoj; 27.546 farmistoj, farmlaborantoj kaj kamparanoj; 59.273 dommastrinoj; 60.578 aliaj okupoj; entute, do, 925.034 personoj.

Inter la individuaj subskribintoj troviĝas Franz Jonas, Federacia Prezidento de Aŭstrio; Georgij Kulišev, Vicprezidanto de la Prezidio de la Bulgara Nacia Asembleo; Prof. D-ro Gyula Ortutay, membro de la Prezidio de Hungara Popola Respubliko, akademiano; Sándor Barcs, membro de la Prezidio de Hungara Popola Respubliko, Prezidanto de la Asocio de Hungaraj Ĵurnalistoj, Vic-Prezidanto de la Eŭropa Futbala Asocio (UEFA); Victor Leemans, Prezidanto de la Eŭropa Parlamento; Jacques Vendroux, Vicprezidanto de la Eŭropa Parlamento; Prof. D-ro Hans Furler, Vicprezidanto de la Eŭropa Parlamento; Achille Van Acker, Prezidanto de la Belga Ĉambro de Deputitoj; André Méric, Vicprezidanto de la Franca Senato; Generalo Kyoungsoon Chang, Vicprezidanto de la Korea Parlamento; D-ro Alberto M. Rosselli, Vicprezidanto de la Urugvaja Ĉambro de Depu-

8. Ankaŭ post tiu dato alvenadis folioj kun subskriboj, tiel ke ĝis junio 1969 la Proponon subskribis 930.025 individuaj personoj kaj 3.851 organizaĵoj kun entute ĉ. 73 milionoj da membroj.

titoj; J. O. Krag, Ĉefministro de Danlando; Bjarni Benediktsson, Ĉefministro de Islando; Per Borten, Ĉefministro de Norvegio; Guy Mollet, antaŭa Ĉefministro de Francio; D-ro W. Drees, antaŭa Ĉefministro de Nederlando; Prof. Walter Hallstein, Prezidanto de la Komisiono de la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo; François Mitterrand, Prezidanto de la franca Unuiĝo Demokrata kaj Socialista de la Rezisto; Suehiro Niŝio, Prezidanto de la japana Demokrata Socialista Partio; Prof. D-ro Jaroslav Heyrovský, Nobel-Premiito kaj Membro de Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj; Prof. Jukaŭa hideki, Nobel-Premiito pri fiziko, Japanio; Prof. Paavo Ravila, membro de la Akademio de Finnlando; Jean Rostand, membro de la Franca Akademio; Prof. D-ro Rinĉen, membro de la Scienca Akademio de Mongolio; Upton Sinclair, verkisto, Usono; Kiril, Patriarko de la Bulgara Ortodoksa Eklezio; Kardinalo Barbieri, Ĉefepiskopo de Montevideo, Urugvajo.... (Kompreneble, ĉiuj menciitaj funkcioj de la subskribintoj rilatas al la tempo kiam ili subskribis la Proponon).

Inter la organizaĵoj, kiuj per siaj subskriboj apogis la Proponon, estu menciitaj nur kelkaj (parenteze estas indikita la membronombro de ĉiu el la organizaĵoj): Internacia Federacio de Kristanaj Sindikatoj de Teksaj kaj Vestaĵaj Laboristoj, Belgio (460.000); Internacia Profesia Sekretariejo de Instruistoj, Belgio (286.000); Internacia Unuiĝo de Nutraĵ- kaj Hotel-Industriaj Laboristoj, Bulgario (12 milionoj); Internacia Federacio de Artistaj kaj Intelektaj Societoj de Fervojistoj, Francio (500.000); Universala Homama Asocio, Japanio (300.000); Monda Federacio por Protekto de Bestoj, Belgio (1,500.000); Internacio de Naturamikoj, Svislando (300.000); Socialdemokrata Partio de Germanio (700.000); Socialista Unuiĝo de la Laborpopolo de Makedonio, Jugoslavio (620.000); Partio de Laboro, Nederlando (150.000); Sindikato de Fervojistoj de Aŭstrio (120.000); Ĝenerala Sindikato *Force Ouvrière*, Francio (unu miliono); Industria Sindikato Metalo, Germanio (du milionoj); Urugvaja Federacio de Instruistoj (6.000); Unuiĝo de Ligoj por Edukado de Infanoj en Jugoslavio (400.000); Religia Organizaĵo Oomoto, Japanio (275.000); Laborista Federacio de Junularaj Organizaĵoj de la Meksikia Respubliko (200.000); Dana Sporta Unuiĝo (unu miliono); Turisma Klubo de Francio (500.000); Argentina Federacio de Elektro-Kooperativoj (530.000)....

22.4.3 Transdono al la Sekretariato de UN

Pliaj ampleksaj preparlaboroj estis necesaj en ligo kun la transdono de la Propono al la Sekretariato de UN en New York. Ili rilatis al verkado de aparta Memorando kaj ĝia traduko en kvar naciajn lingvojn; ordigo de aldonotaj dokumentoj; fotokopiado de la ĉefaj subskriboj; finnombrado de la subskriboj de unuopuloj kaj de organi-

zaĵoj; kunordigo de la laboro inter la centraj organoj de la Asocio kaj la Esperanta Informcentro en New York; artikoloj kaj komunikoj por la gazetaro.

La tuta materialo rilate la Proponon estis ordigita kaj klasigita en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam, tiel ke oni povis kaj plu povas facile kontroli ĉiun unuopan subskribon ĉu de individuo ĉu de organizaĵo. Pro la amplekso kaj pezo de la materialo la Sekretariato de UN esprimis la deziron akcepti la Proponon nur kun preciza resumo de ĉiuj subskriboj laŭ la 12 kategorioj (v. supre en 22.4.2) kaj kun apartaj listoj de la plej elstaraj individuaj subskribintoj kaj de la plej gravaj organizaĵoj.

Delegacio de UEA, aganta en tiu ĉi kazo en la nomo de ĉiuj subskribintoj, transdonis la Proponon al la Sekretariato de UN la 6-an de oktobro 1966. La delegacio konsistis el jenaj 7 personoj: Prof. D-ro Ivo Lapenna, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio; f-ino Marianne Vermaas, direktorino de la C.O. de UEA en Rotterdam; Eskil Svane, sekretario en la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, Danlando, kaj membro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado en Londono; Francis E. Helmuth, inĝeniero, prezidanto de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko; Mark Starr, eksperto pri laborista edukado, kunlaborinto en usonaj ŝtataj komitatoj pri laborista edukado kaj en la Internacia Organizaĵo de Laboro, prezidanto de la Esperanta Informcentro en New York; John Lewine, membro de la Konsulta Komitato por Fremdaj Lingvoj en la Departemento de Edukado de New York, prezidanto de la Esperanto-societo en New York; Alexander Schwartz, tradukisto en la traduka servo de la Sekretariato de UN, prezidanto de la Esperanto-Klubo en la Sekretariato de UN kaj reprezentanto de la junularo sekcio de UEA. Laŭ sia konsisto la delegacio reflektis ĉiujn tavolojn de la vasta strukturo de UEA: ekde la centraj organoj de la Asocio ĝis la Esperanto-Klubo en la Sekretariato de UN.

La delegacion akceptis s-ro Chakravarthi V. Narasimhan, Vicsekretario kaj Ĉefo de Kabineto de la Ĝenerala Sekretario U Thant. La prezidanto de la delegacio eksplikis parole la kontribuon de UEA al la Jaro de Internacia Kunlaboro, la lingvan situacion en la mondo kaj la esencan celon de la Propono. Samtempe al s-ro Narasimhan estis transdonitaj la sekvantaj dokumentoj: listo de la membroj de la delegacio; listo de ĉiuj transdonitaj dokumentoj; 300 fotokopioj, lukse binditaj en formo de du grandaj ledaj dosieroj, entenantaj ĉ. 1.500 subskribojn de la plej eminentaj unuopuloj kaj de la plej gravaj organizaĵoj; listo de la menciitaj individuaj kaj kolektivaj subskribintoj; statistika resumo pri ĉiuj subskribintoj laŭ la stato komence de oktobro; presita Memorando en la lingvoj angla, franca, hispana, rusa kaj Esperanto, inkluzive la tekston de la Propono; doku-



Nov-Jorko la 6an de oktobro 1966: Prof. D-ro Ivo Lapenna transdonas la Proponon al Unuiĝintaj Nacioj al la Vicsekretario de UN s-ro C.V. Narasimhan (maldekstre). Dekstre staras f-ino M.H. Vermaas, kaj en la fono s-ro M. Starr.

mentoj de CED I/VII/4, I/VII/5, C/III/9, C/III/10, en kiuj troviĝas la Laborplano de UEA por JIK, la Raporto pri la kontribuo de la Esperanto-Movado al JIK, Raportoj pri la Rilatoj inter UEA kaj Unesko en la periodoj 1958-1963 kaj 1964-1965; Rezolucio pri Edukado al Internacia Kompreniĝo kaj Kunlaboro, akceptita de la Dua Lerneja Konferenco en Graz, en julio 1966. Al la Memorando mem estis aldonitaj la dokumentoj de CED A/II/1 *La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj*, CED/7 *Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo Esperanto*, B/I/2 *La Eduka Valoro de la Esperanto-Instruado en la Lernejoj*, ĉio aŭ en la angla, franca kaj hispana, aŭ nur en la angla.

La delegacio prezentis al s-ro Narasimhan persone, ĉar li estas Hindo, la verkon *Malsata Ŝtono* de R. Tagore, kiu aperis kiel la unua publikaĵo en la Serio de UEA Oriento-Okcidento. Plue, la delegacio transdonis en du ekzempleroj la verkojn *Dia Komedio* de Dante, *Zamenhof — Creator of Esperanto* de M. Boulton kaj *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro*. Unu kompleto de la tri verkoj estis por s-ro Narasimhan kaj la alia por U Thant.

La prezidanto de la delegacio atentigis la Vicsekretarion, ke tre veršajne tio ĉi estas la plej amasa kaj rimarkinda propono iam ajn prezentita al internacia instanco surbaze de privata iniciato, kaj esprimis la esperon, ke Unuiĝintaj Nacioj plej atente konsideros la Proponon. La Vicsekretario konsentis pri la graveco de la lingva problemo, promesis publikigi koncizan komunikon por la gazetaro kaj, se iel eble, informi jam dum tiu Sesio de la Ĝenerala Asembleo la delegaciojn de la Ŝtatoj-Membroj pri la transdono de la Propono. Efektive, la Sekretariato publikigis la informon por la gazetaro, kaj tiu informo aperis en diversaj gazetoj, sed ĝi ne informis la delegaciojn pri la transdono de la Propono.

La saman tagon de la transdono, nome la 6-an de oktobro, la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam sendis la Memorandon kun la aldonoj al ĉiuj Ŝtatoj-Membroj pere de iliaj respektivaj ambasadoj en Hago, Londono, Parizo, Bruselo aŭ Bonn, kun akompana letero en la lingvoj angla, franca, nederlanda kaj germana. Krome, UEA sendis la saman Memorandon ankaŭ al ĉiuj delegacioj de la Ŝtatoj-Membroj en New York. Tiamaniere UEA mem faris tion, kion konforme al la Ĉarto de UN kaj al la Interna Regularo de la Ĝenerala Asembleo, povis kaj devis fari la Ĝenerala Sekretario de UN, respektive la aparato de lia Sekretariato, sed kion li fakte ne faris.

22.4.4 Memorando al UN kaj Ŝtatoj-Membroj

La Memorando, menciita en la antaŭa sekcio, estis adresita al Unuiĝintaj Nacioj kaj al Registaroj de la Ŝtatoj-Membroj. Por ĝi Universala Esperanto-Asocio celis „prezenti kelkajn esencajn faktojn,

interpreti la dezirojn de la subskribintoj kaj formuli sian starpunkton" rilate la Proponon kaj entute koncerne la lingvan problemon en la mondo. Pro la aktualeco de sia enhavo la Memorando meritas apartan konsideron.

La Memorando konsistas el ses mallongaj partoj. La unuaj du partoj koncernas la kontribuon de UEA al JIK kaj kelkajn teknikajn detalojn pri la Propono, jam prezentitajn en la antaŭaj sekcioj de tiu ĉi ĉapitro. En la tria parto estas pritraktita la kvintesenco de la lingva problemo. Ĝi tekstas laŭvorte:

> En la nuna epoko de giganta teknika progreso kaj ĉiurilata interdependeco de la mondo, la internaciaj kontaktoj ĉesis esti privilegio de malmultaj kaj fariĝis rajto de la vastaj popolamasoj. La lingvodiverseco transformiĝis el simpla ĝeno por kelkaj en gravan internacian problemon por ĉiuj. En tiaj kondiĉoj la lingvaj baroj prezentiĝas kiel la ĉefa obstaklo al adekvata internacia komunikado sur ĉiuj kampoj, inkluzive la personajn rilatojn de ordinaraj homoj, kio siavice malhelpas aŭ ofte eĉ malebligas la plenan utiligon de sciencaj atingoj, la ampleksigon de kulturaj interŝanĝoj kaj la pluan evoluigon de internacia kompreniĝo.
> Estas konata la fakto, ke la lernado de diversaj fremdaj naciaj lingvoj — malgraŭ la grandaj fortostreĉoj, tempo kaj materiaj rimedoj dediĉitaj al tiu celo — donas nur tre modestajn rezultojn (kutime eĉ ne pasivan lingvoscion) kaj en ĉiu okazo neniel sukcesis solvi la kompleksan kaj daŭre akriĝantan lingvan problemon en ĝia tuteco, nome en ĉiuj sferoj de la nuntempa internacia vivo en mondaj kadroj. La sistemo de oficialaj kaj t.n. laboraj lingvoj — ĉiam pli multnombraj kaj ne ĉiam la samaj — en diversaj registaraj kaj neregistaraj internaciaj organizaĵoj ne nur ne solvas kontentige la demandon eĉ por la limigitaj bezonoj de la koncernaj organizaĵoj, sed ankaŭ kontraŭas la principon de egaleco de ĉiuj nacioj, grandaj kaj malgrandaj. Tial la adopto de la neŭtrala Internacia Lingvo (Esperanto) konforme al la Propono respondas al la bezonoj de la moderna homo en la kosma erao kaj prezentas la solc racian, justan kaj radikalan solvon de tiu ĉi problemo en ĉiuj ĝiaj aspektoj: pure teknikelingva, socia, psikologia, politika kaj ekonomia. Informoj pri la lingva problemo en la nuntempaj internaciaj rilatoj troviĝas en la Dok. A/II/1 aldonita sub B.

En la kvara parto estas prezentitaj bazaj faktoj pri Esperanto. Tiun parton apogis plia dokumento de CED, aldonita al la Memorando (CED/7), kiu entenas faktojn pri la formiĝo, strukturo, literaturo kaj ĉefaj aplikoj de la lingvo. La dokumento estis eldonita en la lingvoj angla, franca kaj hispana. Poste ĝi aperis en multaj aliaj lingvoj: ĝis aprilo 1973 entute 17 eldonoj en Esperanto kaj en 12 naciaj lingvoj, en pluraj dekmiloj da ekzempleroj.

La kvina parto rilatas al naciaj lingvoj kaj Esperanto. Jen ĝia teksto:

22 KOMUNA LINGVO ANTAŬ INTERNACIAJ INSTITUCIOJ

La proponita solvo de la lingva problemo en la mondo per la neŭtrala Esperanto neniel celas malgravigi la scion de fremdaj naciaj lingvoj, nek ĝi estas direktita kontraŭ la libervolan lernadon de tiuj lingvoj en kiu ajn senco. La ĝeneraliĝo de la Internacia Lingvo en la internaciaj rilatoj ne malhelpus, ke ĉiu nacio, depende de sia geopolitika pozicio kaj de siaj konkretaj bezonoj, dediĉu laŭ sia bontrovo al tiu aŭ alia fremda nacia lingvo apartan atenton en siaj lernejoj kaj ebligu al personoj kun speciala talento por lingvoj ellerni laŭdezire kiun ajn alian lingvon. Eĉ tiurilate la scio de Esperanto povas nur helpi, kiel evidentigis la enketo farita de la Centro de Esploro kaj Dokumentado en 1964.
La enketo havis la celon establi la kulturan kaj edukan valoron de instruado de Esperanto en la lernejoj. Ĝi montris, ke la lernado de la Internacia Lingvo donas multe pli kontentigajn rezultojn ol la lernado de la fremdaj naciaj lingvoj kaj ke, krome, la lernado de Esperanto (a) helpas al pli bona kompreno de la propra nacia lingvo, (b) faciligas la lernadon de fremdaj naciaj lingvoj, (c) kontribuas al pli efika lernado de pluraj aliaj objektoj, precipe de geografio kaj historio, (d) havas grandan valoron por kiu ajn formo de edukado al internacia kompreniĝo. Detaloj pri la enketo kaj analizo de ĝiaj rezultoj troviĝas en Dok.B/I/2 aldonita sub D/. Pli vasta enketo kaj pli profunda studo de tiu demando povus esti entreprenita de UN aŭ sub ĝiaj aŭspicioj. Ĝenerala enkonduko de Esperanto en la lernejojn ne nur ne signifus plian ŝarĝon de la instruprogramoj, sed, male, liberigus kaj tempon kaj energiojn por la urĝe necesa vastigo de instruado de aliaj objektoj por ĉiuj, inkluzive la fremdajn naciajn lingvojn por tiuj, kiuj efektive havas kaj talenton kaj inklinon por la lingvolernado.

La Memorando finiĝas per jena konkluda rimarko:

En la nomo de ĉiuj subskribintoj kaj en sia propra UEA petas la Ĝeneralan Sekretarion de UN entrepreni la necesajn paŝojn por doni sekvon al la Propono, kaj la Registarojn de Ŝtatoj-Membroj apogi ĝian progresivan realigon. UEA deklaras sin preta liveri ĉiujn aldonajn informojn, kiuj povas helpi al plia klarigo de kiu ajn aspekto de la lingva problemo kaj de la solvo, kiun prezentas la Internacia Lingvo. Se montriĝos, ke estas necese studi la tutan problemon en aparta komisiono antaŭ ol fari la finan decidon, UEA insistas, ke en tiu komisiono troviĝu kiel egalrajtaj membroj almenaŭ kelkaj alte kvalifikitaj specialistoj pri lingvoscienco, pedagogio, internaciaj rilatoj, eventuale aliaj brancoj, kiuj krom tio plene regas la Internacian Lingvon. Iliajn nomojn UEA komunikos en kiu ajn momento.
La radikala kaj definitiva solvo de la lingva problemo en la senco de la Propono — la plej impona iam prezentita al internacia instanco — estos unu el la plej gravaj kaj plej signifaj pozitivaj eventoj en la tuta kultura historio de la homaro kaj malfermos novajn perspektivojn por multe pli vasta kaj pli profunda interpopola kunlaborado sur ĉiuj kampoj, internacia kompreniĝo, progreso kaj paco. Ne mal-

utilante al kiu ajn, ĝi prezentas senfinajn avantaĝojn por ĉiuj individuoj, ĉiuj nacioj, ĉiuj rasoj, por la homaro kiel tuto.

En 1973 la starpunkto de UEA estas sama, kiel en 1966, kiam la Estraro subskribis la Memorandon. Pro la plua komplikiĝo de la lingva problemo, la argumentoj de la Memorando validas eĉ pli ol en 1966.

22.4.5 Sekvoj kaj Signifo

Per sia komuniko al la gazetaro de la 7-a de oktobro 1966, n-ro 3312, la Sekretariato mallonge informis pri la transdono de la Propono. Responde al la letero de la delegacio de UEA de la 10-a de oktobro rilate la promeson, faritan dum la ceremonio de la transdono, ke la Propono estos komunikita al la delegacioj, s-ro C. V. Narasimhan, en sia funkcio de Ĉefo de Kabineto, skribis la 13-an de oktobro: „Post atenta konsidero mi trovas, ke tio ne estas ebla. La Raporto de la Komitato por JIK estis cirkuligita al la Registaroj antaŭ 6 monatoj (Dok. A/6627 de la 31-a de marto 1966). Ĉar tio ĉi estas Raporto de la Komitato por JIK, ĉia ajn aldono devus esti aprobita de la Komitato, kiu, praktike, ne plu ekzistas. La sola materialo, kiun ni eldonas kiel aldonojn, estas la respondoj de la Ŝtatoj-Membroj". En la letero li plu asertas, ke „ĉia ajn propono por la studo de la ebleco uzi Esperanton kiel internacian lingvon devos veni de iu Membro-Registaro".

La letero de la Ĉefo de Kabineto enhavas malĝustaĵojn eĉ senkonsidere al la fakto, ke la Propono rilatas al io alia ol li asertis, kiel ankaŭ al la erara formulo „Membro-Registaro" anstataŭ Registaro de Ŝtato-Membro, kio al Ĉefo de Kabineto de la Ĝenerala Sekretario de UN devus ne okazi. En longa letero de la 22-a de oktobro 1966 al s-ro C. V. Narasimhan, la prezidanto de UEA skribis interalie:

> Mi ne povas kaŝi mian grandan surprizon kaj seniluziiĝon pri la enhavo de via letero koncerne la eblecon informi la Ŝtatojn-Membrojn pri la Propono. Laŭ mia scio, punkto 24 „Raporto de la Komitato por la Jaro de Internacia Kunlaboro" ankoraŭ ne estas pritraktita en la Pleno de la Ĝenerala Asembleo. Tial, nenio fakte malhelpas aldonon pri la Propono al la Raporto koncerne tiun punkton, precipe se oni konsideras la fakton, ke nia organizaĵo tre aktive partoprenis en JIK *je la invito de la Sekretariato mem.* Mi estas eĉ pli surprizita, ĉar mi scias ke ordinaraj leteroj kaj rezolucioj de aliaj NROj estis komunikitaj al la Ĝenerala Asembleo (vidu, ekzemple, A/INF/117 de la 15-a de oktobro 1966). En nia kazo ne temas pri nura letero aŭ rezolucio, sed pri Propono subskribita de preskaŭ *unu miliono da individuoj kaj iom malpli ol 4.000 organizaĵoj.* Tial la rifuzo informi la

Ĝeneralan Asembleon pri tiu ĉi Propono — la plej impresa iam ajn prezentita al internacia instanco surbaze de privata iniciato — ne povas esti komprenata alimaniere ol kiel klara diskriminacio, kaj tial plene nekomprenebla....
En la fino de via letero vi asertas, ke „ĉia ajn propono por la studo de la ebleco uzi Esperanton kiel internacian lingvon devos veni de iu Membro-Registaro". Mi ne opinias, ke, konforme al la Ĉarto kaj la Procedura Regularo de la Ĝenerala Asembleo, ĉiuj proponoj necese devas esti faritaj de la Registaroj de Ŝtatoj-Membroj, ĉar la Ĝenerala Sekretario havas tiurilate tre vastajn povojn. Tamen, en la nuna momento mi ne petas, ke la Sekretariato metu la demandon en la tagordon de la Ĝenerala Asembleo, sed mi devas insisti ne nur en la nomo de UEA, sed ankaŭ en tiu de ĉiuj subskribintoj de la Propono, ke la Sekretariato informu la Registarojn de la Ŝtatoj-Membroj pri la Propono, kiu estis oficiale prezentita al vi kaj akceptita de vi. Pretere dirite, kiel povas kiu ajn el la Registaroj de la Ŝtatoj-Membroj proponi la enmeton de tiu ĉi punkto en la tagordon de iu estonta Sesio de la Ĝenerala Asembleo, se la Ŝtatoj-Membroj eĉ ne scias kion ajn pri la prezento de la Propono?

La Ĉefo de Kabineto respondis per sia letero de la 27-a de oktobro. Li restis je sia starpunkto kaj diris, ke li havas „nenion por aldoni al sia antaŭa letero". Tamen, li ne donis unusolan kontraŭargumenton. Sekve, la prezidanto de la Asocio skribis plian leteron la 20-an de decembro 1966, al kiu, aldone, estis koncize prezentita la evoluo de la rilatoj inter UEA kaj UN. Koncerne la aserton, ke la Komitato por JIK ne plu ekzistis, en la letero estis dirite:

Ni deziras, tamen, emfazi, ke, kvankam la Propono estis farita „okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro", ĝi ne estas adresita al la Komitato por JIK, sed al Unuiĝintaj Nacioj. La sugesto, ke la Propono povus esti komunikita per aldono al la Raporto de la Komitato por JIK estis via propra kaj, okaze de la transdono, nia delegacio akceptis ĝin kiel unu el la eblaj vojoj, kvankam ne la plej taŭga, por informi la Ŝtatojn-Membrojn.

En la sama letero de la 20-a de decembro estis proponitaj pluraj eblaj solvoj: (i) ke la Ĝenerala Sekretario, konforme al la Regulo 13 (g) de la Procedura Regularo de la Ĝenerala Asembleo, metu la Proponon en la tagordon en unu el la sekvaj sesioj de la Ĝenerala Asembleo; (ii) ke la Sekretariato de UN transdonu la Proponon al Unesko, se la Ĝenerala Sekretario opinias, ke tiu organizaĵo estas pli taŭga por trakti la aferon; (iii) ke la Sekretariato informu la Ŝtatojn-Membrojn pri la fakto, ke ĝi formale akceptis la Proponon, kio ebligus al la Registaroj de la Ŝtatoj-Membroj iniciati plian agon; (iv) se neniu el la supraj sugestoj estas akceptebla por la Sekretariato, ke ĝi informu kian alian solvon ĝi proponas.

22.4 PROPONO AL UNUIĜINTAJ NACIOJ

Per sia letero de la 28-a de decembro la Ĉefo de Kabineto sciigis, ke li respondos al la diversaj sugestoj „post kiam mi estos diskutinta tiujn sugestojn kun miaj kolegoj, el kiuj nuntempe multaj libertempas". En la letero de la 20-a de januaro 1967 s-ro C. V. Narisimhan informis: „Mi nun ricevis la opiniojn de miaj kolegoj kaj mi bedaŭras diri, ke, pro nombro da diversaj kaŭzoj, ne estas eble realigi kiun ajn el viaj diversaj sugestoj".

La plua korespondado inter UEA kaj la Sekretariato, kiel ankaŭ multnombraj leteroj de subskribintoj al UN, ne donis pli pozitivan rezulton. El la letero de s-ro Narasimhan de la 20-a de januaro 1967 klare sekvas, ke grupo da „kolegoj" en la Sekretariato mem blokis la Proponon kontraŭe al la Ĉarto kaj al la Procedura Regularo de UN en ligo kun la senduba fakto, ke la Propono ne estis adresita al la Sekretariato, en kiu kazo ĝi eble rajtus agi tiel, sed al Unuiĝintaj Nacioj pere de la Sekretariato.

La sinteno de la Sekretariato kaŭzis grandan malkontenton inter multaj subskribintoj kaj profundan indignon en la tuta Esperanto-Movado.

En tiaj cirkonstancoj la 52-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Rotterdam de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto 1967, ĉiuvoĉe akceptis Rezolucion pri la sinteno de la Sekretariato. En la Rezolucio la Kongreso esprimis dankon al la Estraro de UEA pro la laboro farita en ligo kun la Propono kaj al la delegacio de la Asocio, kiu transdonis ĝin al la Sekretariato de UN. La Kongreso ankaŭ plene aprobis la sugestojn de la prezidanto de UEA, faritajn en pluraj leteroj al la Sekretariato de UN. En la cetera parto de la Rezolucio troviĝas jenaj partoj:

> La Kongreso konsideras la neklarigitan rifuzon de la Sekretariato komuniki la Proponon al la Ŝtatoj-Membroj, aŭ meti ĝin en la tagordon de la Ĝenerala Asembleo, aŭ transdoni ĝin al Unesko, aŭ fari kiun ajn alian paŝon, kiel kontraŭan al la spirito de la Ĉarto kaj kiel maloportunan por la interesoj kaj prestiĝo de UN. Ĝi opinias, ke la Sekretariato ne estas kompetenta decidi pri la sorto de Propono direktita ne al la Sekretariato mem, sed al UN.
>
> La fakto, ke la Propono ne estas menciita en kiu ajn oficiala publikaĵo de UN, povas esti interpretita nur kiel intenca prisilentado de ĉi tiu amaspropono, kiu.... prezentiĝas kiel unika laŭ sia enhavo kaj plej granda laŭ la nombro de subskriboj iam ajn adresita en la kultura historio de la homaro al internacia instanco surbaze de privata iniciato.
>
> La Kongreso esprimas sian firman konvinkon, ke unu el la fundamentaj Homaj Rajtoj, rekonita de ĉiuj civilizitaj nacioj, estas la rajto proponi/peticii, kio inkluzivas la rajton ricevi respondon.

22 KOMUNA LINGVO ANTAŬ INTERNACIAJ INSTITUCIOJ

Laŭ la komisio de la Kongreso, la Estraro komunikis la kompletan tekston de la Rezolucio al la Ĝenerala Sekretario de UN, dum CED eldonis ĝin kiel Dok. A/VI/14 kaj sendis ankaŭ al Unesko, al Naciaj Unesko-Komisionoj kaj aliaj instancoj. Ĝiaj ĉefaj punktoj aperis en la plej gravaj nederlandaj taggazetoj. Pri ĝi raportis la telegrafagentejoj AP kaj ANP. Artikoloj kaj informoj estis publikigitaj en multaj gazetoj kaj periodaĵoj de aliaj landoj.

Necesas aldoni, ke la Estraro de UEA intencis entrepreni novan grandan kampanjon en ligo kun la sinteno de la Sekretariato de UN kaj surbaze de la Rezolucio de la UK en Rotterdam. En tiu tempo ankoraŭ ne estis findecidita la t.n. Skandinavia Propono al Unesko. Temas pri tio, ke Danlando, Finnlando, Islando, Norvegio kaj Svedio estis prezentintaj al la Ĝenerala Konferenco de Unesko proponon, ke la „Ĝenerala Direktoro antaŭvidu la necesajn financajn rimedojn en la Projekto de la Programo kaj Buĝeto por 1969-70 kun la celo establi internacian Komisionon, konsistantan el pedagogiaj, lingvo-sciencaj kaj teknikaj ekspertoj, por objektive konsideri en kiuj sferoj ekzistas bezono por internacia lingvo kaj por esplori la eblecojn havigi rimedojn de komunikado por kontentigi tiujn bezonojn". Tiu propono kaj pluraj aliaj rilatantaj al la estonta programo de Unesko ne povis esti pritraktitaj de la 14-a Sesio de Unesko fine de 1966. Oni do atendis, ke la sekva Sesio, okazonta en 1968, okupiĝos pri la afero. Por ne ĝeni en kiu ajn senco la pritrakton de tiu oficiala propono de kvin ŝtatoj en la Ĝenerala Konferenco de Unesko, UEA decidis, laŭ la insista peto de alta funkciulo en unu el la proponintaj registaroj, rezigni pri la intencita monda kampanjo. Tiu rezigno, tamen, neniel helpis, ĉar bedaŭrinde la Skandinavia Propono ne estis renovigita kaj tial ĝi estis forigita el la tagordo.

La fakto, ke la Sekretariato de UN blokis la Proponon neniel signifas, ke ĝi en kiu ajn senco sukcesis malaperigi ĝin. Nenio malhelpas, ke kiu ajn Ŝtato-Membro aŭ klarvida Ĝenerala Sekretario levu la demandon pri la lingva problemo surbaze de la Propono, aŭ eĉ sen-konsidere al la Propono. Ĉio dependas de tio ĉu Unuiĝintaj Nacioj, Unesko kaj aliaj interŝtataj aŭ supernaciaj institucioj fakte deziras ebligi amasan komunikadon inter ordinaraj homoj kaj efike kontribui ne al subskribado de formalaj interŝtataj traktatoj, sed al vera interkompreniĝo de la popoloj kaj unuopuloj.

En ĉiu okazo unu el la celoj — atentigi denove pri la lingva problemo en la mondo kaj pri la solvo, kiun prezentas la Internacia Lingvo — estas atingita tre kontentige. Preskaŭ unu miliono da unuopuloj kaj 4.000 organizaĵoj kun multmiliona membraro estis objektive informitaj pri Esperanto. Denove aperis centoj da artikoloj kaj informoj en la gazetaro de multaj landoj, okazis radio-disaŭdigoj,

intervjuoj kaj televidaj programoj. Ĉio ĉi estas konsiderindaj pozitivaj atingoj, kiuj per si mem abunde pravigas tiun grandskalan mondan agadon, en kiu sindone partoprenis multaj Esperanto-organizaĵoj kaj unuopuloj. La Propono kaj la amasa apogo, kiun ĝi ĝuis, estas kaj plu estos efike utiligataj por plua disvastigo de la Internacia Lingvo.

22.5 ESENCA BIBLIOGRAFIO

Lapenna, Ivo, „La signifo de la Unesko-Rezolucio"; „Demonstracia debatvespero en Parizo". *Esperanto*, vol. 46, 1953, n-ro 566 (1), p. 3-11. (En la sama n-ro de *Esperanto* troviĝas la originala teksto de la Rezolucio de Unesko de 1952 kaj la parolado de la observanto de UEA en la Ĝenerala Konferenco.)

—, „La signifo de la decidoj de Unesko"; „Unesko rekonis la valoron de Esperanto por la edukado, scienco kaj kulturo"; „La Universala Esperanto-Ekspozicio en Montevideo". *Esperanto*, vol. 48, 1955, n-ro 591 (2), p. 35-67. (En la sama numero troviĝas la parolado de la observanto de UEA en la Programkomisiono, la originalaj tekstoj de la Rezolucio de la 10-a de decembro 1954 en la hispana, angla kaj franca; listo de la ĉefaj dokumentoj de Unesko; leteroj de la observanto de UEA al funkciuloj de Unesko k.a. dokumentoj.)

—, „Transdono de la Propono al UN". *Esperanto*, vol. 59, 1966, n-ro 733 (12), p. 185-186. (En la sama numero troviĝas la kompleta teksto de la Memorando al UN kaj Registaroj de la Ŝtatoj-Membroj.)

—, „The common language question before international organisations". *La Monda Lingvo-Problemo*, vol. 2, 1970, n-ro 5, p. 83-102; kaj vol. 3, 1971, n-ro 7, p. 11-30. (Ampleksaj resumoj en Esperanto. Multnombraj dokumentoj de la Ligo de Nacioj kaj Unesko cititaj en la piednotoj.)

Malmgren, E., „Novjara saluto de la Prezidanto". *Esperanto*, vol. 46, 1953, n-ro 566 (1), p. 1.

—, „La venko en Montevideo". *Esperanto*, vol. 48, 1955, n-ro 591 (2), p. 33.

Privat, Edmond, „Esperantistaj legendoj" *Esperanto*, vol. 47, 1954, n-ro 580 (3), p. 71.

—, „Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj". *Esperanto*, vol. 51, 1958, n-ro 629 (4), p. 57-59.

Vermaas, M. H., „Montevideo kaj ĝiaj sekvoj". *Esperanto*, vol. 51, 1958, n-ro 629 (4), p. 65-66.

—, „Okazaĵoj ĉirkaŭ la transdono". *Esperanto*, vol. 59, 1966, n-ro 733 (12), p. 178-192.

Periodaĵoj kaj Dokumentoj:

Dokumentoj de CED, precipe A/VI/5-A/VI/7, A/VI/11-A/VI/15; C/III/6, C/III/8, C/III/10; I/VII/4 kaj I/VII/5.

Esperanto, precipe por 1951-1955 kaj 1964-1967.

Raportoj de la Estraro, Jarlibro de UEA, Dua Parto, precipe 1951-1956 kaj 1964-1969.

Noto: Por la verkado de tiu ĉi ĉapitro estas utiligitaj ankaŭ multnombraj dokumentoj en la arkivo de CED, precipe n-roj 124, 233, 274, 283-284, 2.126 (fotokopioj de la kompleta dokumentaro rilate al Esperanto en la diskutoj de 1922 en la Ligo de Nacioj); 217 (kompleta dokumentaro pri la Pariza Sesio de la Ĝenerala Konferenco en 1952); 631-638 (kompleta dokumentaro pri la Montevidea Sesio de la Ĝenerala Konferenco en 1954, inkluzive sonbendon pri la tuta diskuto de la 10-a de decembro en la Pleno); 2.596 (kompleta dokumentaro pri la Propono al UN, inkluzive la tutan korespondadon inter UEA kaj UN pri tiu afero).

SESA PARTO

PERSPEKTIVOJ POR LA ESTONTECO

ĈAPITRO 23

ESENCAJ ANTAŬKONDIĈOJ POR RAPIDIGI LA PROGRESON

23.1 MADRIDAJ TEZOJ

La tempo daŭre, senhalte fluas. Tial nuntempo, eĉ frakcio de sekundo, fakte ne ekzistas. Sole pasinteco kaj estonteco estas realaj, dum nuntempo povas esti konceptata nur kiel sintezo de la du kontraŭaĵoj, nome kiel samtempa kunekzistado de la pasinteco kaj estonteco. En la ĉiutaga vivo la esprimo „nuntempo" povas esti kaj ja estas uzata por praktikaj bezonoj, sed kondiĉe kaj relative: tiel relative, ke ĝi povas rilati, depende de la kunteksto, al momenteto aŭ al jarmiloj.

La estontecon kondiĉas la pasinteco. „Inter ili" troviĝas la konstante ŝanĝiĝanta „nuntempo", kiun eblas ĝuste taksi nur kiel rezulton de la pasinteco kaj kiel funkcion de la estonteco. En tiu senco pravas la malnova diro, ke „historio estas instruistino de la vivo".

En la antaŭaj ĉapitroj de tiu ĉi verko Esperanto kaj la kompleksa lingva demando ĝenerale estis prezentitaj en historia perspektivo, kio ebligis pli reliefe analizi la aktualan lingvan situacion en la mondo kaj la pozicion de la Internacia Lingvo en la nuntempo. Pro la metodo aplikita tio ankaŭ ebligis ne profeti, sed ĵeti ekrigardon en la estontecon rilate la probablan pluan evoluon de tiu aŭ alia aspekto de la tuta problemaro.

Tiu ĉi lasta, konkluda parteto de la verko estu resume dediĉita al perspektivoj por la estonteco kaj al la rolo de la Esperanto-organizaĵoj por rapidigi la procezon de progresiva disvastiĝo de la Internacia Lingvo. Kiel bazo estas prenitaj la Madridaj Tezoj (v. Ĉap. 18.4.2.2), ĉar ilin ĉiuvoĉe akceptis la Komitato de UEA kaj tial ili devas esti

rigardataj kiel kolektiva starpunkto de la supera organo de la neŭtrala Esperanto-Movado.

23.2 SPONTANECO KAJ SIGNIFO DE ORGANIZITA LABORO

23.2.1 Neceso Difini la Rolon

La lingva situacio en la mondo kaj la evolutendencoj, kiujn ĝi entenas, unuflanke, la aktuala pozicio de la Internacia Lingvo kaj ĝiaj perspektivoj por la estonteco, aliflanke, postulas klaran difinon de la rolo de la Esperanto-organizaĵoj, kiel ankaŭ de la laborprincipoj de iliaj gvidaj instancoj. Ili estas formulitaj en la sekvantaj fundamentaj tezoj.

23.2.1.1 *Evoluo Kondukas al Solvo per Esperanto.* — Kiel ĉiuj observantoj antaŭvidis jam antaŭ multaj jaroj, la lingva problemo en la mondo devis necese komplikiĝi pro la antagonismo inter la kreskantaj bezonoj de komunikado kaj la lingvodiverseco, kiu obstaklas la kontentigon de la bezonoj. Tio kondukis al la nuna absurde neracia stato, karakterizita de tensioj kaj diversformaj prilingvaj luktoj sur internacia kaj nacia niveloj. En ĉiuj siaj aspektoj la lingvoproblemo konstante akriĝas kaj tial ĉiam pli impete postulas radikalan solvon.

Science analizi sociajn fenomenojn, inkluzive la abunde pritraktitan en tiu ĉi verko, signifas rigardi ilin ne statike, sed dinamike; ne en formo de senmovaj statoj, sed en tiu de evoluprocezoj. La dinamismo sur la lingva kampo klare indikas, ke la evoluprocezo direktiĝos pli aŭ malpli frue al la solvo, por kiu pledas la Esperanto-Movado, ĉar tiu solvo prezentiĝas kiel sintezo de la konfliktaj interesoj de nacismo kaj universalismo: de la firma volo de la popoloj kaj etnaj grupoj konservi siajn respektivajn lingvojn kiel ĉefajn elementojn de siaj identecoj, unuflanke, kaj la postulatoj de mondvasta komunikado sur ĉiuj niveloj, aliflanke. Tio estas spontana procezo, sed ĉiun spontanan procezon eblas rapidigi per konscia, organizita laboro, se tiu laboro respondas al la evolutendencoj.

23.2.1.2 *Konvinko el Objektiva Analizo.* — La ekzisto mem de la Esperanto-organizaĵoj, kaj entute la laboro por la Internacia Lingvo en kia ajn formo, havas sencon, nur se la du supraj premisoj estas ĝustaj. Ili estas ĝustaj, kiel evidentigas la faktoj kaj analizoj en tiu ĉi libro. Se ili ne estus ĝustaj, la sola prudenta ago estus nuligi tuj ĉiujn organizaĵojn kaj senprokraste ĉesigi ĉian ajn agadon por Esperanto, ĉar la organizaĵoj povus nenion atingi kaj la laboro estus kom-

plete sensenca. La solvo de la lingvoproblemo per Esperanto, kun ĉiuj pozitivaj kromefikoj, devas esti afero ne de espero aŭ de naiva fido, sed de firma konvinko bazita sur objektiva analizo de faktoj. Foresto de tia konvinko estas fonto de duboj kaj ne malofte eĉ de defetismo. Evidente, en la gvidaj instancoj de la Esperanto-organizaĵoj, unuavice de UEA, ĉevas troviĝi personoj, kiuj, pro sia konvinko aŭ, se ili ne havis la eblecon mem studi la demandon, pro sia sensancela fido al la konkludoj atingitaj de la studintoj, estas kapablaj mem firme agi kaj disradii ĉirkaŭ si senkompromisan firmecon. Defetismo ne estas allasebla sur kiu ajn nivelo de batalanta movado.

23.2.1.3 *Konservo kaj Fortikigo de la Lingva Unueco.* — Por rapidigi la solvon necesas, ke la rimedo estu kiel eble plej ellaborita, maksimume perfekta, tiel ke en ĉiu momento ĝi plene taŭgu por la samtempaj bezonoj de internacia komunikado en ĉiuj sferoj de la vivo. Ĉar ĉio evoluas kaj lingvo reflektas tiun evoluon, ĝi signifas, ke necesas daŭre plu evoluigadi la Internacian Lingvon, praktike ĝin uzadi, riĉigadi ĝin per nova kultura enhavo, sed samtempe konservi ĝian absolutan unuecon. Tiun rolon plenumas la kreskanta literaturo kaj la vastiĝanta uzo de la lingvo sur diversaj kampoj. Siavice, la ampleksiĝo de la praktikaj aplikoj de la lingvo entenas danĝerojn por la lingvounueco. En tiaj kondiĉoj la rolo de la Akademio de Esperanto, ekde la komenco rekonita de ĉiuj kiel la supera lingva instanco, fariĝas eĉ pli grava, ol antaŭe. Tial, rigora observado de la decidoj kaj rekomendoj de la Akademio estas antaŭkondiĉo por ĉia ajn plua sukcesa laboro por la Internacia Lingvo.

23.2.1.4 *Daŭra Modernigado de UEA.* — En 65 jaroj de sia ekzistado, venkinte multajn malfacilaĵojn, UEA evoluis al forta internacia asocio, apartenanta sendube al la cento de la plej gravaj el inter ĉ. 3.000 nun ekzistantaj en la mondo. Ĝi estas rekonita de internaciaj kaj landaj instancoj kiel reprezenta organizaĵo de la Esperanto-Movado. Ĝia reputacio kreskas de jaro al jaro. La tasko de ĉiuj personoj parolantaj la lingvon, precipe de la aktivuloj, estas fortikigi la Asocion ĝis maksimumo, por ke ĝi povu kiel eble plej efike plenumi sian rolon. Eĉ simplaj parolantoj, ne povantaj aktive agadi, povus kaj devus apogi la Asocion almenaŭ per membriĝo aŭ modesta financa helpo. Ju pli sukcese agas UEA kaj la organizaĵoj apartenantaj al ĝi, des pli da personoj ellernas la lingvon kaj des pli granda la utilo, kiun donas la lingvoscio por ĉiuj.

Kreado aŭ apogado de paralelaj organizaĵoj aŭ instancoj kun esence samaj celoj kaj idealoj — sed sen realecaj perspektivoj, sen la bezonataj homaj fortoj, materialaj rimedoj, reprezenta karaktero kaj adekvata prestiĝo — kompromitas la aferon, disrompas la fortojn, kreas konfuzon kaj, en la fina linio, malutilas al la pozicioj de la

Internacia Lingvo, kiel tion klare montras la historio de la Esperanto-Movado.

Asocio reprezentanta mondan movadon kaj pretendanta universalecon en horizontala (teritoria) kaj vertikala (faka) sencoj ne povas kontentige funkcii, se ĝi ne kunligas en sia organiza strukturo internaciecon kaj demokratecon kun la plej alta grado de efikeco. UEA, kiu sukcese adaptis sin al la modernaj cirkonstancoj, lerte kombinas en sia Statuto la tri elementojn en tiel modela maniero, ke pli taŭga strukturo apenaŭ estas imagebla en la nunaj kondiĉoj. Neniu alia internacia organizaĵo atingis la samon. Malgraŭ sia aĝo, UEA restas juna kaj freŝa. Ankaŭ en la estonteco ĝi devos adapti sin al la samtempaj kondiĉoj kaj konceptoj por konservi la necesajn junecon kaj dinamikecon. UEA estas kaj plu estos pli ol ampleksa por ebligi al ĉiu Esperanto-organizaĵo kaj al ĉiu aganto por la Internacia Lingvo esprimiĝi kaj kunlabori.

Aliflanke, UEA devos ankaŭ en la estonteco, eĉ pli ol en la pasinteco, subtenadi ĉiujn iniciatojn kaj agadojn favore al la Internacia Lingvo, kuraĝigadi la Esperanto-instruadon en kiu ajn formo, apogadi ĉiaspecajn utiligojn de la lingvo por praktikaj aŭ aliaj celoj ekster siaj kadroj. UEA devas esti rigardata ne kiel memsufiĉa, sed kiel instiga kerno de vasta moviĝo direktita al ĝeneraliĝo de Esperanto. Ĝia ekzisto estas nepre necesa, por ke iam ĝi fariĝu tute superflua.

23.2.1.5 *Neŭtraleco.* — Necesas ankoraŭfoje emfazi, ke UEA kiel tia estas politike neŭtrala, sed tio neniel implicas, ke ĝiaj membroj estus en kiu ajn senco senigitaj de sia rajto havi proprajn politikajn aŭ aliajn konvinkojn. UEA ne estas, nek laŭ sia Statuto povas esti, neŭtrala koncerne kiun ajn aspekton de la lingva problemo, inkluzive la politikan, aŭ rilate kiun ajn formon de diskriminacio kaj persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo aŭ la Esperanto-organizaĵoj. Strikta observado de tiel difinita principo de neŭtraleco estas unu el la bazaj kondiĉoj de la universaleco de UEA kaj tial ankaŭ de ĝia sukcesa laboro.

23.2.1.6 *„Suvereneco" Neaplikebla.* — UEA estas nek ŝtato, nek federacio aŭ konfederacio de ŝtatoj. Tial, apliki al ĝi, aŭ al la organizaĵoj, el kiuj ĝi konsistas, la ideon de suvereneco, aŭ kiun ajn alian principon de ŝtata organizo, kiel kelkaj klopodis fari, estas esence erara kaj misgvida. Same erare estas identigi ĝin al industria entrepreno aŭ komerca kompanio. UEA estas socia-kultura organizaĵo, libervole formita por progresigi la celojn formulitajn en la Statuto. Ĝusta kompreno de ĝia karaktero faciligas glatan funkciadon de la servoj kaj plenumadon de konkretaj taskoj.

23.2 SPONTANECO KAJ SIGNIFO DE ORGANIZITA LABORO

23.2.1.7 *Evoluigo kaj Vastigo de la Agadoj.* — En Ĉap. 18.5 estas prezentitaj kaj analizitaj la agadoj de UEA en la tri ĉefaj branĉoj, sistemigitaj en sep grupoj. Konservi kaj evoluigi ĉiujn nunajn agadojn, krei novajn en la bazaj branĉoj kaj agadgrupoj signifas progresigadi la lingvon; malatenti aŭ ĉesigi ilin, aŭ unusolan el ili, signifas stagnon aŭ eĉ regreson.

23.2.1.8 *Kunlaboro inter Egaluloj.* — Pro la tuta karaktero de UEA, kaj por ke ĝi povu efike plenumi sian rolon, ĉiuj ĝiaj partoj, ĉiuj instancoj, funkciuloj kaj unuopaj membroj devas esti rigardataj kiel same gravaj por la progresigo de la tuto. Ĉio, kio rezultigas unusolan plian uzanton de la lingvo, estas pozitiva kaj tial subteninda. La rilato „superulo-subulo" ne estas akceptebla. Ankaŭ la rilato inter la komitatanoj kaj estraranoj de diversaj organizaĵoj, unuavice de UEA, unuflanke, kaj la oficejoj aŭ la unuopaj geoficistoj, aliflanke, devas esti rigardata pli kiel rilato inter kunlaborantoj, ol kiel tiu de labordonantoj kaj dungitoj. Tio signifas, ke la profesiaj laborantoj en niaj organizaĵoj devas rilati al sia laboro kun entuziasmo kaj amo, kiujn postulas la grandeco de la afero kaj la grava funkcio, kiun ili plenumas. Observo de tiu principo malebligos burokratismon aŭ malkonkordojn, aŭ ambaŭ, kio multe helpos al pli efika laboro de la oficejoj.

23.2.1.9 *Observado de Decidoj.* — Kiel montrite en Ĉap. 18.2.4, la demokrata maŝinaro de UEA ebligas ĝisfundajn diskutojn, sed ĝi ankaŭ postulas konsciencan plenumon de la faritaj decidoj. Pro la ofta malatentado de la kompetentecoj laŭ la Statuto kaj pro la neplenumado de diversaj decidoj (kelkfoje eĉ intence en la nomo de ia imagita „suvereneco"), miloj da horoj, kiujn oni povus utiligi por pozitiva laboro, estas ĉiujare vane malŝparataj por superfluaj korespondado, admonoj, instigoj kaj petoj pri plenumo de io, kion oni estus devintaj jam delonge realigi. La plenumado de ĉiuj decidoj estas ne nur postulato konforma al la celoj, pro kiuj UEA ekzistas kiel organizaĵo, sed ankaŭ afero de elementa lojaleco ŝuldata al la kunlaborantoj en la sama aŭ aliaj instancoj.

23.2.1.10 *Plenumo de Taskoj.* — En la nuna evolustadio kaj kun la nun disponeblaj materiaj rimedoj, kiuj malebligas konsiderindan altigon de la nombro de geoficistoj kun adekvataj kvalifikoj, la membreco en komitatoj, estraroj aŭ aliaj organoj postulas ne nur aktivan partoprenon en la farado de decidoj, sed ankaŭ multe da laboro por realigi ilin. Se oni akceptas iun funkcion aŭ taskon, oni samtempe akceptas la moralan devon plenumi ĝin. En la pasinteco, bedaŭrinde, tro ofte oni neglektis tiun devon, kio kaŭzis seriozajn obstaklojn al normala disvolviĝo de la laboroj, grandan tempoperdon, plendojn kaj eĉ superfluajn elspezojn. Sen radikala forigo de tiu

manko ne estas imagebla pli grandskala progresado laŭ la principo: komuna decidado; individua, sendependa plenumado de la decidoj. La koncepto de ia „direktoraro", kiu nur decidus kaj ordonus, sed lasus la faktan laboron plene en la manoj de granda salajrata oficista aparato, ne estas aplikebla al Esperanto-organizaĵoj, ĉar tia aparataro tutsimple ne ekzistas.

23.2.1.11 *Rolo de la C.O.* — Se la CO ne funkcias glate, ĉiuj aliaj agadoj devas lami. Tial la tuta CO, kiel kolektivo, kaj ĉiu unuopa oficisto-kunlaboranto havas apartan respondecon, kiu postulas sindonan rilaton al la laboro kaj aktivan partoprenon en la realigo de la agadprogramoj de la Asocio. Nur sub tiuj kondiĉoj la CO povos, eĉ pli sukcese ol en la pasinteco, plenumi sian funkcion per la disponeblaj rimedoj por la salajroj kaj por aliaj materiaj elspezoj. La samo rilatas al geoficistoj de la aliaj Esperanto-organizaĵoj, se ili sukcesas establi oficejon.

23.2.1.12 *Aldonaj Devoj de Funkciuloj.* — La laboro por la Internacia Lingvo estas nek simpla, nek facila, kiel montras la tuta historio de la Esperanto-Movado. Ĝi postulas de ĉiuj aktivuloj libervolan disponigon de tempo kaj energio. La personoj en gvidaj pozicioj, inkluzive la profesiajn kunlaborantojn, havas aldonajn devojn, kiuj, interalie, ofte necesigas pliajn temporabajn oferojn de intelektaj kaj fizikaj fortoj. De la karaktero de ilia laboro grandparte dependas ne nur la atingoj aŭ malsukcesoj, sed ankaŭ la pozitiva, indiferenta aŭ negativa imago pri Esperanto en la publika opinio. Tio eksplikas, kial en kelkaj regionoj aŭ medioj la Esperanto-organizaĵoj estas respektataj kaj la agado por la Internacia Lingvo apogata, dum en aliaj ili estas bagateligataj. Feliĉe, ekde Zamenhof kaj la unuaj pioniroj ĝis la hodiaŭa tago, ne mankis personoj, kiuj sur diversaj kampoj dediĉis kaj certe plu dediĉos siajn talentojn kaj laborfortojn al ĉiuflanka progresigo de ideo, objektive apartenanta al grupeto da decide gravaj por la estonteco de la homaro. Atenta leginto de tiu ĉi verko ne povas ne enpensiĝi almenaŭ dum momento pri la miloj da personoj, kiuj devis oferi multajn milionojn da labortagoj por produkti tion, kion la titolo de la libro seke nomas „faktoj pri la Internacia Lingvo", dum aliaj centmiloj eklernis kaj ekuzis la lingvon, en la komenco eĉ ne atendante ian „praktikan utilecon". Rezulte — malgraŭ ĉiuspecaj obstakloj, ekde antaŭjuĝoj ĝis militoj kaj konsciaj kontraŭstaroj pro motivoj de kultura imperiismo, aŭ eĉ rektaj persekutoj — la lingvo sukcese disvastiĝis tra la mondo kaj socie enradikiĝis.

Malfeliĉe, ĉiam troviĝis ankaŭ individuoj, kiuj pro personaj ambicioj, envioj kaj similaj homaj malfortoj, aŭ pro pli kompleksaj psikologiaj kaj aliaj motivoj, klopodis detrui tion, kio jam estis pene

konstruita. Ofte la plej aktivaj kaj sukcesaj laborantoj fariĝis viktimoj de insidaj intrigoj kaj sengustaj insultoj, kio kutime tiel lacigis kaj amarigis ilin, ke ili finfine komplete rezignis pri plua laboro. Tiuj valoraj perdoj kaŭzis stagnojn aŭ regresojn, dum primitivismo provizore jubilis, ĝis troviĝis novaj pozitivaj fortoj, kiuj komencis rekonstruadi por fronti la saman sorton post kelka tempo. La stranga irado en formo de du paŝoj antaŭen kaj unu paŝo malantaŭen estas unu el la pliaj kaŭzoj, kiuj obstaklas pli kontentigan progresadon. Sen elimino de tiu negativa fenomeno ne estas eble atendi multe pli grandajn sukcesojn. La homo estas nia plej granda valoro. Necesas multe pli da respekto kaj por li kaj por lia laboro.

23.2.2 Konkludo

La supraj tezoj, kvankam formulitaj abstrakte, estas bazitaj sur la studo de historiaj eventoj en la Esperanto-Movado aldone al la multjaraj personaj spertoj de la aŭtoro ekde 1928. Ili montras aron da pozitivaj kaj negativaj faktoroj, efikantaj rapidige aŭ bremse je la ritmo, laŭ kiu progresas la disvastiĝo de Esperanto. Diference de la eksteraj faktoroj — nekontroleblaj, kvankam iugrade influeblaj en kelkaj kazoj — la internaj troviĝas plene en la povosfero de la Esperanto-Movado kaj estas ĝia respondeco. La celo estis nek laŭdi, nek riproĉi, sed nur konstati por maksimume faciligi kaj efikigi la laboron en la estonteco. La konkludo altrudiĝas per si mem: flegi kaj evoluigi ĉion pozitivan, firme kaj senkompromise liberiĝi de ĉiuj negativaĵoj. Ju pli baldaŭ, des pli bone. En la rapide maturiĝantaj kondiĉoj por la solvo de la lingva problemo ne estas tempo por prokrasti kaj rezignacie observadi.

Eble iuj pensas, ke organizita laboro ne estas necesa, se estas ĝusta la analizo, ke la evolutendencoj en la sino de la socio necese altrudas neŭtralan lingvon kiel solvon de la lingva problemo. Tia rezonado ne estas ĝusta. Historia determinismo, aŭ eĉ determinismo entute, ne estas fatalismo. La Internacia Lingvo, kiel montrite precipe en la unuaj du ĉapitroj, estas produkto de konkretaj historiaj kondiĉoj; sed, foje formiĝinta, ĝi mem fariĝas reala parto en la plua evoluprocezo. Se Esperanto ne ekzistus kiel plene funkcianta lingvo, solvo per neŭtrala lingvo ne estus eĉ imagebla. Ankaŭ la Esperanto-Movado kiel organizita socia korpo, kaj eĉ ĉiu el la uzantoj unuope, estas, same tiel, infanoj de la leĝeco reganta la evoluon; sed, samtempe, ambaŭ estas konsistaj elementoj de tiuj materiaj kaj sociaj fortoj, kiuj puŝas la homaron en la direkton de integriĝo en diverseco, t.e. kun unu tuthomara kaj multaj naciaj, etnaj kaj aliaj lingvoj. Tio eksplikas la eksterordinare gravan rolon de la Esperanto-

organizaĵoj, unuavice de UEA. Ju pli forta ĝi estas, des pli granda ĝia influo kiel socia premgrupo kaj des pli sukcese ĝi kontribuas al rapidigo de la solvo. Cetere, eĉ por adeptoj de nedeterminismaj skoloj la konkludo rilate la rolon de organizita laboro estas fakte identa: se efektive la realo ekskluzive aŭ unuavice dependas de nia libera volo, tiam ni povas, per nia vola premo, direkti la evoluon de la realo al la celo diktata de nia racio.

Sur la sojlo de la sekva periodo UEA staras pli forta ol iam antaŭe kaj ĝi povas eĉ konsiderinde plifortiĝi. Inspirita de la vere imponaj ĝisnunaj atingoj de la Internacia Lingvo, UEA mobilizu ĉiujn fortojn por ekspluati la favorajn kondiĉojn de la nuna historia epoko kaj amase disvastigi la lingvon. Oni memoru, ke konvenaj historiaj okazoj ne kutimas ripetiĝi. La pluaj perspektivoj por Esperanto estas pli ol kuraĝigaj. La signifo de UEA kaj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj por realigi ilin kiel eble plej baldaŭ estas decide grava.

ĜENERALA BIBLIOGRAFIO

Auld, William, *Mitoj kaj faktoj pri Esperanto* (CED-Dok. A/IV/7). Londono 1964.

Boulton, Marjorie, *Zamenhof. Aŭtoro de Esperanto.* La Laguna 1962.

Couturat, L., kaj L. Leau, *Histoire de la langue universelle.* Paris 1903, 2-a eld. 1907.

Dratwer, Isaj, *Pri internacia lingvo — dum jarcentoj* (CED-Dok. A/VII). London-Rotterdam 1970.

Drezen, E., *Historio de la mondolingvo. Tri jarcentoj da serĉado.* Trad. N. Hohlov kaj N. Nekrasov. Leipzig 1931 (represo Oosaka 1967).

—, *Analiza historio de Esperanto-movado.* Leipzig 1931 (represo Kioto 1972).

—, *Zamenhof.* Leipzig 1929 (represo 1970).

Gregor, D. B., *La kultura valoro de Esperanto* (CED-Dok. A/IV/8). Londono 1967.

Janton, Pierre, *L'espéranto.* Paris 1973.

Kalocsay, K., kaj G. Waringhien, *Plena Gramatiko de Esperanto.* 2 vol. 3-a eld. Milano 1958-64.

Lapenna, Ivo, *Retoriko.* 3-a eld. Rotterdam 1971.

— (red.), *La Internacia Lingvo. Faktoj pri Esperanto.* Londono 1954.

—, *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj.* Rotterdam 1966.

—, *Bazaj faktoj pri la Internacia Lingvo (Esperanto).* 2-a eld. (Dok. CED/7). Londono 1972.

Manders, W. J. A., *Interlingvistiko kaj esperantologio.* Purmerend 1950.

Markarian, Raif, *La eduka valoro de la instruado de Esperanto en la lernejoj* (CED-Dok. B/I/2). Londono 1964.
Pechan, Alfonz (red.), *Gvidlibro por Supera Ekzameno.* 2 vol. Budapest 1964-66.
Privat, Edmond, *Historio de la lingvo Esperanto.* 2 partoj. Leipzig 1923-27.
—, *Vivo de Zamenhof.* 5-a eld. Rickmansworth 1967.
Ŝirjaev, I. (ĉefred.), L. Kökény kaj V. Bleier (red.), *Enciklopedio de Esperanto.* 2 vol. Budapest 1933-34.
Waringhien, Gaston, *Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj.* La Laguna 1959.
— (ĉefred.), *Plena Ilustrita Vortaro.* Paris 1970.
Zamenhof, L. L., *Fundamento de Esperanto.* 9-a eld. Red. A. Albault. Marmande 1963.
—, *Originala Verkaro.* Red. J. Dietterle. Leipzig 1929.
—, *Leteroj de Zamenhof.* Red. G. Waringhien. 2 vol. Paris 1948.

BIBLIOGRAFIOJ

Haupenthal, Reinhard, *Enkonduko en la librosciencon de Esperanto.* Nürnberg 1968.
Stojan, P. E., *Bibliografio de Internacia Lingvo.* Genève 1929 (represo Hildesheim-New York 1973).
Tonkin, Humphrey, *Esperanto and international language problems: A research bibliography.* 3-a eld. Washington, D.C. 1972.

PERIODAĴOJ

Dokumentaro pri la nuna stato de la Internacia Lingvo Esperanto (CED)
Esperanto, oficiala organo de UEA
Jarlibroj de Universala Esperanto-Asocio
La Monda Lingvo-Problemo
Kontakto, revuo de TEJO

LISTO DE MALLONGIGOJ

AEA: Aŭstralia Esperanto-Asocio
AEF: Aŭstria Esperantista Federacio
AEL: Argentina Esperanto-Ligo
AELA: Asocio de E-istaj Libro-Amikoj
a.K.: antaŭ Kristo
AM: Asocia Membro
art.: artikolo
BEA: Brita Esperanto-Asocio; Bulgara Esperantista Asocio
BEF: Belga Esperanto-Federacio
BEL: Brazila Esperanto-Ligo
BET: Bulgara Esperanto-Teatro
BIL: Bibliografio de Internacia Lingvo
CDEL: Centra Dana Esperantista Ligo
CEKIT: Centro por Esperanto en Komerco, Industrio kaj Turismo
CED: Centro de Esploro kaj Dokumentado
CK: Centra Komitato
CO: Centra Oficejo
Cs: ĉeha lingvo
ĉ.: ĉirkaŭ
Ĉap.: Ĉapitro
ĈD: Ĉefdelegito
ĈEA: Ĉeha Esperanto-Asocio
ĈEL: Ĉina Esperanto-Ligo
D: Delegito; germana lingvo
Da: dana lingvo
dok.: dokumento
D-ro: Doktoro
EAF: Esperanto-Asocio de Finnlando
EANA: Esperanto-Asocio de Norda Ameriko
EKI: Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio
EKRELO: Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo
ekz.: ekzemple
eld.: eldonis; eldonita
ELI: Esperanto-Ligo en Israelo
ELNA: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
En: angla lingvo
EP: Esperantaj Prozaĵoj
EPC: The Esperanto Publishing Company
Eo: Esperanto
F: franca lingvo
FA: Faka Asocio
FAO: Organizaĵo de UN por Nutraĵo kaj Agrikulturo
FD: Fakdelegito
FeZ: Felix Zamenhof
f-ino: fraŭlino
FK: Fundamenta Krestomatio
FLE: Federacio de Laboristaj Esperantistoj
GEA: Germana Esperanto-Asocio
GEJ: Germana Esperanto-Junularo
GEV: Grajnoj en Vento
HEA: Helena/Hungara Esperanto-Asocio
HEF: Hispana Esperanto-Federacio
HM: Honora Membro
HP: Honora Patrono
Hu: hungara lingvo
i.a.: interalie
IAF: Internacia Arta Festivalo
IALA: International Auxiliary Language Association
IAREV: Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj
IAT: Internacia Arta Teatro
ICK: Internacia Centra Komitato
IEAJ: Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj
IEF: Itala Esperanto-Federacio
IEK: Internacia Ekzamena Komisiono
IEL: Internacia Esperanto-Ligo
IEMW: Internacia Esperanto-Muzeo Wien
IF: Informa Fako
IFEF: Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
IGS: Internacia Gazetara Servo
IJHR: Internacia Jaro de Homaj Rajtoj
IJK: Internacia Junulara Kunveno (Kongreso; Konferenco)
IKUE: Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
ILEI: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
ILO: Internacia Labor-Organizaĵo; Internacia Labor-Oficejo
IM: Individua Membro
inĝ.: inĝeniero
inkl.: inkluzive
IPE: Internacio de Proleta Esperantistaro
ISAE: Internacia Scienca Asocio E-ista
ISU: Internacia Somera Universitato
It: itala lingvo
IUEF: Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj
Ja: japana lingvo

LISTO DE MALLONGIGOJ

jc.: jarcento
JD: Junulara Delegito
JEI: Japana Esperanto-Instituto
JEL: Jugoslavia Esperanto-Ligo
JIK: Jaro de Internacia Kunlaboro
k.a.: kaj aliaj
KELI: Kristana E-ista Ligo Internacia
KGS: Kongresa Gazetara Servo
KKK: Konstanta Komitato de la Kongresoj
KKL: Konsulta Komisiono pri Lernejoj
KKS: Konstanta Kongresa Sekretario
KLEG: Kansai Ligo de Esperanto-Grupoj
k.m.a.: kaj multaj aliaj
KOKO: Kopenhaga Konversacia Klubo
KR: Kongresa Regularo; Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj
k.s.: kaj simile
KSM: Koresponda Servo Mondskala
ktp.: kaj tiel plu
L: latina lingvo
LA: Landa Asocio
LEA: Laborista Esperanto-Asocio
LEEN: Nederlanda Esperanto-Asocio "La Estonto Estas Nia"
LI: Lingvo Internacia
LIBE: Ligo Internacia de Blindaj E-istoj
LK: Lingva Komitato
LKK: Loka Kongresa Komitato
LM: Literatura Mondo
LMLP: La Monda Lingvo-Problemo
LR: Lingvaj Respondoj
LS: Landa Sekcio; Loka Societo
MA: Membro-Abonanto
Mag.: Magistro
MEM: Mondpaca Esperantista Movado
MS: Membro-Subtenanto
NEL: Norvega Esperantista Ligo
Nl: nederlanda lingvo
No: norvega lingvo
NRO: Neregistaraj Organizaĵoj
n-ro: numero
OA: Oficiala Aldono al Universala Vortaro
OK: Organiza Komitato
OV: Originala Verkaro
p.: paĝo(j)
PEA: Pola Esperanto-Asocio
PG: Plena Gramatiko de Esperanto
PIF: Pupteatra Internacia Festivalo
PIV: Plena Ilustrita Vortaro
p.K.: post Kristo
Pl: pola lingvo
Prof.: Profesoro
ps.: pseŭdonimo
Pt: portugala lingvo
PV: Plena Vortaro
red.: redaktoro; redaktis
resp.: respektive
Ro: rumana lingvo
Ru: rusa lingvo
SAT: Sennacieca Asocio Tutmonda
SEF: Sveda Esperanto-Federacio
SEL: Skolta Esperanto-Ligo
SES: Svisa Esperanto-Societo
SEU: Sovetrespublikara Esperantista Unio; Somera Esperanto-Universitato
SFPE: Societo Franca por la Propagando de Esperanto
Sh: serbokroata lingvo
SIE: Supera Internacia Ekzameno
s-ino: sinjorino
Sp: hispana lingvo
SPPE: Société pour la propagation de l'Espéranto
s-ro: sinjoro
STELO: Studenta Tutmonda E-ista Ligo
STT: Scienca kaj Teknika Terminaro
Sv: sveda lingvo
TAGE: Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj
t.e.: tio estas
TEJO: Tutmonda E-ista Junulara Organizo
TEĴA: Tutmonda E-ista Ĵurnalista Asocio
TEKA: Tutmonda E-ista Kuracista Asocio
t.n.: tiel nomata
tr.: tradukis
Tu: turka lingvo
UD: Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj
UEA: Universala Esperanto-Asocio
UEF: Unuiĝo Esperantista Franca
UFE: Universala Federacio Esperantista; Unuiĝo Franca por Esperanto
UIA: Unio de Internaciaj Asocioj
UK: Universala Kongreso
UL: Universala Ligo
UMEA: Universala Medicina Esperanto-Asocio
UN: Unuiĝintaj Nacioj
Unesko: Organizaĵo de UN por Eduko, Scienco kaj Kulturo
UV: Universala Vortaro
v.; vd.: vidu
VD: Vicdelegito
vol.: volumo
VPEA: Vjetnama Pacdefenda E-ista Asocio

INDEKSO DE PERSONOJ

En ĉi tiu indekso la nomoj estas ordigitaj laŭ la simplaj literoj de la Esperanta kaj latina alfabetoj, sen konsidero pri nacilingvaj supersignoj k.s. Nomoj, kiuj komenciĝas per Ŝ aŭ Ś, ekzemple, aperas inter tiuj komenciĝantaj per S.

Aars, K. 254
Abdúl Bahá 258
Åberg, I. 320
Abesgus 138, 244, 293
Abonyi, A. 214
Abrahám, G. 197
Absolon, K. 267
Acker, A. van 780
ADA (ps. de Atanasov, A.)
Adam, E. (ps.: Lanti) 164, 207, 208, 242, 264, 265, 302, 496, 640, 641, 643-649, 653-656, 658, 660, 662, 708, 724
Adam, Z. (ps. de Zakrzewski)
Adam, M. 290
Adamík, Vl. 199
Adams, W.G. 165
Adamson, E. 163, 164, 263, 484, 518, 519
Adamson, H. 148, 152, 161
Adelsköld 63
Adoratskij 263
Afonso Costa, A. 260
Agaronjan, A. 197
Agricola: ps. de Jakob, H.
Aguro saiiĉiro 177
Ahlberg, P. 138, 276, 293
Ahmad, M.T. 258
Afivlediani 222
Aimola, H. 680
Aisberg, E. 241-243, 267
Aizière, J. 59
Ajayi, K. 341
Ajcatur 197
Akegarasu haya 255
Akita uĵaku 219, 245
Akutagawa ryûnosuke 220
Al-Amili, H. 197, 258
Alarcón, P.A. 214
Albault, A. vi, 66, 72, 109, 128, 286, 301, 320, 339, 343, 519, 520, 616, 668, 803
Albert, A. 178
Albert-i-Paradis, C. (ps.: Català) 223
Aleksandro la granda 4
Aleksiev, N. v, vi, 451, 530
Alencar 229
Alesiano (ps.) 260
Alexander 258
Alexandersson, S. 285
Alfonso la 13-a (reĝo) 465
Ali (imamo) 197, 258
Alighieri, Dante 31, 146, 217, 219, 327, 784
Alimĝan, H. 235
Alkeo 196
Allen, L. 195
Almada, Fr. 279
Almássy 273
Altenburger 214, 237
Altmeier, P. 382
Alvárez-Quintero, J. 212
Alvárez-Quintero, S. 212
Amicis, E. de 74, 216, 217, 247, 322
Amit, A. 267
Amos, E.W. 193
Anakreono 196
Andersen, H.C. 74, 127, 128, 202, 247, 330, 334, 497
Andersson, D. 91
Andreev, A.P. 270, 661, 725, 746
Andreev, N.D. 500
Andrejev, L. 231
Andrew, St. A. 195, 483
Andrews, F.E. 266
Andrianova, N. 235, 507
Andrić 222
Anev, A. 325
Ángel-Sica, M. 269
Angiolieri, C. 219
Anh duk 236
Antonio (sankta, el Padovo) 278
Anuruddha, T.T. 259
Applebaum, J.D. 60, 165, 184, 209, 210
Aprosio, E. v
Apuleius 223, 224
Arabeno, M. 217, 255
Arantes do Nascimiento, E. (ps.: Pelé) 279
Arany 214
Arbes, J. 199
Arbure, Z.C. 262
Arcaini, E. 64, 121
Arfa (princo) 749
Argus: ps. de Ellersiek
Ariosto, L. 219
Aristofano 196
Arisîma takeo 219
Armand, D.L. 339, 684
Arnesen, O. 247
Arnessen, A. 479
Artemjew, P.A. 286
Artigues, R. 139, 144
Artjuŝkin-Kormilicyn, V.P. 661
Arumov, A. 231
Asch, Ŝ. 221
Ashley 193
Assis, M. de 184, 229
Aszlányi, K. 215
Aŝoko (reĝo) 259, 279
Aŝvinikumar' 182, 254, 320
Atanasov, A.D. (ps.: ADA) 56, 164, 197-199, 527
Atanasov, G. 52, 199
Auld, W. v, 52, 58, 63, 64, 74, 77, 115, 119-121, 169-171, 174, 184, 186, 188, 191, 195, 196, 241, 248, 301, 315, 327, 342, 487, 589, 668, 674, 684,

803
Auriol, V. 760
Averin 272
Avilov, F. 231
Avoto (ps.) 58
Avramović, M. 473
Avril, G. (ps. de Courmont, G. de)
Avsejenko, V.G. 232
Aymonier, C. 58, 140, 300, 444
Azevedo, A. 229
Azorín, F. 184, 283, 496
Azzi, G. 217, 591
Babadagly, A. 268
Babin, P. 693
Babits 159, 215
Backheuser, E. 272, 453
Backmann, B. 240
Backmann, G.H. 235
Bäckström 235, 293
Bacquer, J. 273
Bácskai, I. 286
Badalić, H. 681
Badash, G. 193, 195
Baden-Powell, R. 61, 521
Bader, A. 210
Baekelmans, L. 204
Baena, N. 152, 229
Baghy, Julio (Gyula) 46, 63, 74, 119, 144, 147, 152, 156, 158, 159, 164, 165, 168, 184, 191, 215, 240-242, 277, 300, 323, 327, 329, 341, 466, 467, 666
Bagnulo, R. 217
Baha'u'llah 258, 279
Bailey, W. 195, 260, 269, 271, 278, 665, 666
Baker, A. 262
Bakin 242, 491
Bakker, H. 340, 540, 547
Bakó, S. 180
Balague, A. 529
Balász, B. 60, 74
Balech, E. 289
Balibar, E. 121
Baliński, S. 228
Bálint, F. 746
Bálint, G. 466
Balkányi, P. 529, 744
Balliman 207
Balmont, K.D. 232
Bałucki 228
Balzac, H. de 206, 207
Bandlow 209
Banham, F.R. v, 449
Bannier, L. 644, 659
Barabás, Á. 466
Baranyai, I. (ps.: Emba) 147, 159, 168
Barbacetto, A. 266
Barbarus (v. Vares-Barbarus)
Barbey, B. 768
Barbiellini-Amidei, A. 185, 470
Barbieri (kardinalo) 781
Barbosa, R. 278
Barbusse, H. 207, 370, 372, 640, 641, 645, 650, 700
Barcs, S. 780
Bárczi, G. 466
Bardoux, J. 758
Barit, C. 276
Barrio-y-Moraita 256
Barrocas, A. 486
Barthelmess, N. vi, 163, 210, 644, 645, 655, 661
Bartoševičius 224
Basdevant, J. 27
Bastien, G. 265
Bastien, L. 72, 140, 206, 283, 285, 438, 440-442, 549, 552, 592, 593, 612, 665, 666, 763
Batta, J. 722
Baudelaire 146, 166, 168, 205, 208
Baudet, A. 355
Baudin-Vatré, J. 150, 152
Baudouin (reĝo) 382
Baudouin, C. 156, 269
Baudouin-de-Courtenay, J. 305, 422, 522
Baupierre, H. 185, 301
Baur, A. vi, 207, 210, 230, 240, 343, 485
Bayol 291
Bean, C.M. 193, 226, 288
Beau, J. 207
Beaufront, L. de (ps. de Chevreux, L.) 66, 132, 137, 138, 140, 141, 237, 258, 295, 416, 417, 421-423, 460, 664, 698
Beaucaire, L. 186
Beaumarchais 204
Becerro-de-Bengoa, R. 212
Beck, R. 139, 206
Becker, D. 661
Becker, G. v, 538, 540, 616
Beckford, C. v
Becquerel 305
Bedeković, D. 473
Beeby 770
Beekman, V. 203
Beethoven, L. van 328, 331
Behrendt, A. 206, 288, 506
Behrmann, H. 76, 78, 80, 81, 265, 464
Bein, K. (ps.: Kabe) 57, 139, 141, 190, 209, 226-228, 231, 232, 237, 277, 300, 416, 666, 698
Bela Manto (ps. de Mirski)
Beleva, B. 325
Belinfante, F.J. 281, 291
Bellamy, E. 271, 272
Belmont, L. (ps. de Blumenthal, L.)
Belorukov, S. 232
Benavente, J. 211, 212
Benatzky, R. 322
Ben-Cvi, I. 468
Benczik, V. 174
Bendix, K. 202
Benedikto la 15-a (papo) 257
Benediktsson, B. 781
Benet 212
Benetka, B. 244
Ben-Jehuda, E. 468
Benniemann, P. (ps.: Pebe) 63, 209, 210, 277, 290
Bennett, A. 193
Benoit, P. 207
Bérard, L. 652, 653, 701, 749, 758
Beraru, M. 150
Berenguer, J.F. 212

Berg, C.C. 681, 683
Berger, J.F. 60, 210
Berger, R. 423
Berggreen, J. 479
Bergiers, L. 115, 163, 207, 645
Bergman, S. 248, 273
Bergson, H. 701
Berland 262
Berlot 255
Bernadotte (grafo) 275
Bernard, R. 57, 58, 72, 166, 208, 301, 315, 327, 331, 343, 668
Bernard, T. 38, 206, 247, 322
Bernot, L. 137
Berthelot, D. 140, 305
Berthelot, P. 206, 287, 637
Bertolazzi, E. 325
Bertrana, P. 223
Berzsenyi 214
Bezruč, P. 199, 200, 246, 247
Bhave, V. 494
Bianchini, J. 255, 257, 270, 290
Bicknell, C. 52, 119, 137, 192, 216, 300, 314
Bidoit, E. 693
Biernacki 277
Biest, W. van der 204, 207
Biest-Andelhof, A. van der 142, 225
Binder, S. 221
Bing, H.F. 262, 531
Bischitzky 210
Bisci 267
Bjørnson, B. 226
Blaikie 193
Blaĵko, S. 266
Blangarin, F. (ps.: Fibĵango) 262, 302
Blanke, D. 507, 661
Blasco-Ibáñez, V. 212, 247
Blažys 224
Bleier, V. 49, 56, 167, 444, 445, 466, 670, 803
Blicher, M. 277
Blicher, S.S. 202
Blin 286
Blinkenberg 769-771
Blinov, E. 233
Bloch, J. de 260
Blodek 151
Blok 232
Blondeaux 286
Blumenthal, L. (ps.: Belmont) 119, 127, 133, 134, 136, 208, 228, 237, 420, 481, 666
Boatman, D.P. 161, 165
Boccaccio, G. 219
Bodereau, M. 693
Bodó, K. 159, 215, 240, 329
Bogdanov, A. 233
Bogdanov, M. 293, 456
Bøgh-Høgsted, A. 202
Bogušević, K. 52, 137, 223, 231, 293
Boirac, E. 53, 58, 139, 140, 206, 254, 300, 421, 664-666
Bokarev, E.A. 500, 501, 668, 683, 722, 744
Bolingbroke Mudie, H. 142
Bölsche 142, 209
Bonev, T. 328
Booth, F. 268, 285
Booth, J. 449
Borel, E. 251
Borel, J. 141, 206, 207, 269, 449, 462, 485
Borione, C. 469
Borisov, N. (ps.: Ilarij of Robis) 232
Borjan, B. 711, 713
Bormann, A. 73, 308
Bormann, M. 463, 704, 705
Bormann, W. 57, 617, 686
Borobia, J. 331
Borovko, N. 36, 65, 138, 231, 414
Borsboom, E. vi
Borten, P. 781
Bossuet 206, 257
Botev, Ĥ. 197, 199, 246
Böti, L. 180
Botticelli 217, 218
Boubou, M. 652
Bouchard, C. 289, 305
Boucon, H. 139, 144, 207
Boudier-Bakker, I. 225
Boulet, P. 270, 374
Boulton, M. 52, 55, 119, 125, 170, 171, 179, 184-186, 188, 191, 241, 248, 277, 316, 323, 327, 329-331, 444, 455, 674, 684, 746, 784, 803
Bourgeois 772
Bourguignon, H. 517, 652, 691
Bourlet, C. 138, 140, 212, 250, 277, 298, 417, 421, 423, 426, 428, 460
Bovet, P. 60, 140, 242, 269
Bovio, G. 216
Boyd-Orr, J. 382
Brandstaetter, R. 329
Brandys, K. 229
Brătescu-Voinești 230, 247
Braun, S.Z. (ps.: Wiktor Elski) 119, 136
Breitenbach, H. vi
Brejnik, V. 161
Breĵnev, L. 263
Bremón-Masgrau, J. 223, 238
Brenken, E. 256
Bressont, R. 693
Briano, G.B. (J.B.) vi, 289, 520
Bricard, R. 265, 288
Briggs, L. 193, 277
Brigole, A. 278
Briquet, M. 140, 289, 519
Brisigelo, M.E. 214
Broadribb, D. vi, 256, 514
Broek, P.W. 216
Broise, A. 288
Brontë, C. 193
Brouardel 305
Browne, G.L. 137
Broz-Tito, J. 278, 382, 475, 646
Brozović, D. (ps.: Bo Zoroviĉ) 178
Brueys 204
Brüggemann, K. 209, 210, 255, 444
Brugmans, H. 453
Bruijn, J.L. 224, 225, 302

Bruin, G.P. de 444, 645, 661
Brynildsen 272
Brzekowski 275
Brzostowski, A. 480, 481
Brzozowski, S. 269
Buchanan, J. 455
Bücker 209
Buddo 259
Budimir, S. 320
Bugge-Paulsen, R. 290, 479
Bührer 265
Buñarin, N. 256, 733
Bui duc 236
Bujwid, O. 268, 481, 512
Bukar (ps.) 185
Bulgakov, V. 260
Bulthuis, H.J. 119, 144, 162, 165, 193, 202, 204, 225, 244
Bulthuis, R. 225
Bumy, C.E.R. (ps. de Kalocsay)
Bünemann, O. 225
Bunyan, J. 257
Buonarroti, Michelangelo 219
Burda, R. 458, 529, 736, 741, 744
Burenkov, A. 231, 320
Burger, J. 154
Burgmeister, M. v
Burkhardt, A. 256, 526
Burns, R. 342
Burroughs, E.R. 195
Burwinkel, O. 268
Busquet 207
Butler, M.C. 54, 55, 59, 63, 193, 258, 276, 289, 300, 527, 678
Byron 192
Čače, I. 224
Cachin, M. 262
Caetano Coutinho, A. 229, 240, 453
Cailleux, A. 287
Caj juan-pej 490, 491
Calabresi, I. 301
Calderón-de-la-Barca, P. 212
Camargo, J. 229
Camescasse 266
Camões 229
Campoamor, R. de 212
Cankar, I. 151, 221, 323, 331
Canuto, G. 469, 470, 591, 606, 614-616, 671, 682, 683
Cao, V.L. 486, 772
Capé, A. (ps.: Montrosier) 140
Čapek, K. 199, 200, 349
Čapek-Chod, K.M. 200
Capp, C.D.A. 272, 777
Caraça, J. 278
Carducci, G. 219
Carlén, E. 256, 524, 526, 616, 687, 690
Carles, A. 346, 422, 424
Carles, L. 291
Carlevaro, T. iii, iv, vi
Carlsson, M. 148, 168, 208, 235, 241, 301
Carnegie, A. 260
Carolfi, M. 258, 278
Carpophorophilus (ps.) 122
Carroll, L. 192
Cart, T. 58, 138, 140, 270, 291, 293, 417, 418, 420, 422-424, 426, 444, 453, 461, 515, 664-666, 676
Cases-Martín, M. 143
Castagnino, R. 217
Castiglioni, B. 219
Castro Alves 173, 229
Català, V. (ps. de Albert-i-Paradis)
Catalany, M. 207
Cattaneo, P. 266
Catullus 224
Caubel, A. 427, 661
Caumont, A. 209
Čech, R. 341
Čech, S. 246
Cederblad, H. 52
Čejka, T. 59, 457, 517
Cense, E. 444
Cervantes-Saavedra 212
Cesarić 222
Chamisso, A. de 210
Champion, P. 206, 230, 257
Chang, K. 780
Chapelier, E. 661
Chaplin 331, 332
Chapron 510
Charrier, C. 486
Charters, D. 320
Chateaubriand 206
Chaudhuri, B.C. 254, 277
Chaves, S. 120, 173
Chavet, G. 140, 277, 460
Chesterton 193
Chevalier, P. 693
Cheverry, B. 693
Chevreux, L. (ps.: Beaufront, L. de)
Chiabrera, G. 219
Chiussi, I. v, 197, 258
Chopin, F. 277, 330, 331
Christaller, F. 277
Christaller, H. 209
Christaller, P.G. 254, 277, 290, 666
Christie, A. 193
Christie, S.E. 479
Christoffel 276
Chun, Š.M. 201
Cicero, M.Tullius 224
Cigančev, S. 328
Cíchová, J. 175, 200, 301
Cicio Mar 163, 201
Ciliga, P. 523
Claramunt, J.M. 290
Clark, B. 58, 171, 196
Clissold, P. 288
Cnossen, W. 526
Cocteau, J. 323, 327, 328, 331
Codorniu-y-Starico, R. 142
Coelho-Netto 229
Cogen, L. 204
Cohen, B.A. 761
Cohen, M. 3, 27
Colas, C. 139
Čolić, S. 546
Collinder, B. 56, 485, 613
Collins, M. 260
Collinson, W.E. 58, 85, 270, 455, 513, 668, 671, 683
Collodi, C. (ps. de Lorenzini)
Collyn 260
Colonna, V. 219

Comella, J. 53
Comenius (v. Komenský)
Connor, G.A. 487, 551, 582-584, 586, 719
Conquest, R. 746
Conscience, H. 204
Conterno-Guglielminetti, C. v, 176, 183, 217, 301, 315
Čopić, B. 222, 325
Cordero di Montezemolo, C. 469
Corret, P. 140, 207, 665, 666
Corsetti, R. 70, 547
Cotton, A. 140, 251
Coty, R. 382
Coué, E. 269
Coudenhove-Kalergi 274
Courmont, G. de (ps.: Georges Avril) 161, 668
Court, J. de la 267
Court, M. de la 267
Courteline 206
Courtinat, L. 55, 248, 444
Coussé, M. 693
Couteaux, J. 140, 207
Couto-Fernandes, A. 229, 453
Couturat, L. 58, 140, 422, 423, 803
Cowling, C.C. 272
Cox, G. 226
Craven, H.T. 193
Cremer, J.J. 224
Crofts, F.W. 195
Cseh, A. 53, 70, 78, 79, 433, 434, 438, 478, 479, 484, 498, 528, 529, 627, 665, 666, 706, 746
Cubota joji 262
Cujuki kijo 272
Cunningham, A. 193
Curry 193
Cyrankiewicz, J. 382, 735
Czarnowski 481
Czerwiński, M. 226
Czitrom, T. 341
Czuba, Z. 616
Czubryński 481
Čajkovskij 331
Čefeĉ (ps. de Höveler)
Čeñov, A.P. 232, 322, 323, 325, 327-329
Četverikov, I. 266
Čiang kaj-šek 491, 715
Čif toŝio 142, 177, 219, 237, 245
Čikobava, A.S. 737
Čirikov 232
Čulitis 152
Dabek, S. 328
Dąbrowski, R. 228
Dagys, J. 684
Dahl, E. 484, 583
Dalai Lama 531
Dalmau, D. 188, 270, 300, 314, 448
Dalsace, L. 206
Dalsem, R. van 63, 331
Dambrauskas (v. Dombrovski)
Damjanov, V. 330
Danneil 270
D'Annunzio, G. 219
Danov, P. 257
Dao anh Kha v, vi, 236, 503, 507
Darío, R. 214
D'Armon, R. 283
Darnault, M. 332
Darvas, J. 215
Daskalov 197
Daśgupto, P. vi
Daudet, A. 206, 208
Davidov, G. 55, 197, 200, 678, 680
Davidovič, J.L. 468
Dazzini, M. 91, 517
Debussy 331
Decorte, A. 204
Dedieu, J. 517, 693
Dedijer, V. 278
Defoe, D. 193
Degenkamp, G.J. v, 58, 119, 200, 225
Degon, P. 510
Deguči hidemaru 220
Deguči kjotaro 328, 329, 341, 473, 533
Deguči nao 220, 531
Deguči naohi 220
Deguči onisaburo 220, 259, 531
Deguči sumiko 220
Deij, L.C. 150
Dekker, E.D. (ps.: Multatuli) 224
Dekker, M. 225, 247
De Kock, E. 58, 120, 172, 191, 301, 483
Delaire, P. 81, 184, 208, 274, 330, 361
Delak, F. 221
Delcambre, E. 289
Deligny, M.E. 139, 141, 144, 196, 207, 506
Dellian, K. 281, 287, 291
Delor, J. 161, 208
Delsudo (ps. de Hyde)
Demetrović 221
Demidjuk, G.P. 153, 262, 263, 290, 430, 444, 663, 722, 731
Den, P. 200
Denoël, P. 94
Derlatka, T. 274
Dermit, B. 325
Descartes 26, 254
Deschamps, P. 206, 257
Deshays, R. 140, 206
Despotova, V. 330
Destrée 756
Deŝkin, G. 136, 144
Devjatnin, V.N. 47, 58, 132-134, 136, 137, 143, 230-233, 235, 293
Devos, J. 225
Dharmatilake, C.H. 211
D'Hervilly 206
Diatlowicki-Tobi 269
Dickens, C. 128, 192, 193, 322
Dickie, V. 449
Dickinson, L. 757
Diego, F. de 214
Dietterle, J. 55, 62, 72, 131, 167, 383, 410, 434, 445, 462, 803
Dimitrov, G. 263
Dinekov, P. 329
Dinh van van 269
Dinwoodie, J.S. 169, 301
Divjanović 266
Dobrev, I. 199
Dobrzanski, I. 226

Dobrzyński, R. v
Doerner, C. 137
Dollfuss 450, 706
Domanović 222
Dombrovski (Dambrauskas), A. 66, 135, 224, 254, 265, 293
Domènech-i-Mas, A. 150
Domjanić 222
Dondi, E. 217
Dorno, F.V. 164, 165
Doroševič, V. 154, 232
Dorp, P. van 257
Dostoevskij, F. 232
Downes, W.J. 257
Dragona, M. 278
Dragović, M. 325
Dragsted, S. 202, 203
Drajev, K. 325
Dratwer, I. vi, xxvii, 277, 628, 674, 675, 746, 803
Drda, J. 246
Drees, W. 382, 478, 613, 656, 781
Dresen, Helmi 148, 658, 732
Dresen, Hilda 145, 148, 152, 168, 203, 235, 240, 301
Dreyfus, A. 206
Drezen, E.K. 50, 56, 64, 73, 123, 126, 167, 188, 246, 263, 277, 282, 292, 444, 489, 500, 635, 645, 646, 648-650, 652, 658, 662, 721, 722, 725-729, 731, 733, 734, 746, 803
Driessche, van 225
Drizulis, A. 278
Droogendijk 137
Drozdov, A. 154, 232
Držić, M. 323
Duc-Goninaz, M. 175
Dučić 222
Ducommun, Edouard 59
Ducommun, Elie 260
Dufeutrel, V. 206, 231, 260, 277
Duhamel, G. 207
Dumas, A. 206, 207
Dun Karm 496
Dunant, H. 271
Duncan, D.R. 267, 287
Dupuis, R. 207, 208, 327, 328, 330, 331
Dürer, A. 277
Durrant, E.D. 283, 444, 763
Duthilleul, J. 510
Duyós, R. 212
Dvořák 151
Dygasiński 228
Dyk 246
Dza trang 269
Ecabert, C. 485
Echeverría, S. 214
Edmonds 300
Edogaŭa rampo 219
Eeden, F. van 225
Eekhoud 207
Egami fujio 267, 473, 684
Egerrup, H.L. 182, 202, 244
Eggleton 209
Eichendorff 210
Eichholz, R. 76, 283, 342
Eichhorn, H. 320
Einaudi, L. 382
Einstein, A. 644
Einstein, L. 66, 462
Eiselin, J. 287
Ejdelman, B. 265, 662
Ekstrand, L. 271
Ekström, I. 203
El Greco (v. Domeniko Theotokopuli)
Elb, L. 665
Elias, E. 275
Elin-Pelin 199, 246, 325, 329
Eliot 206
Eljot, J. 149
Ellersiek, F. (ps.: Argus) 162, 242
Ellis 144, 666
Elola, J. de (ps.: Coronel Ignotus) 212
Elpin 201
Else 207
Elski, W. (ps. de Braun)
Elsudo (ps. de Kolčinskij)
Elvin, H.L. 195, 613, 681, 683, 761, 769
Emba (ps. de Baranyai)
Enbe 137
Ender 226, 228
Engels, F. 262, 645
Engen, P. 286
Engholm, S. 160, 179, 234, 235, 273, 275, 300, 746
Epton, H. 290
Erben, K.J. 200
Erbetta, M. 76
Erdberg, O. 201
Erdmann, W. 231
Ergović, M. 325
Erkko, J.H. 203
Erošenko, V. 155, 163, 244, 258, 490
Escherich, M. 210
Escrivà-de-Balaguer, J.M. 214, 255
Esipov, V. 743
Eska (ps. de Karolczyk)
Esslemont, J.E. 259, 279
Estable, Don C. 770
Estont, R. 235
Etten, H. van 278
Eŭripido 196
Evans, C. 258
Evidino (ps. de Zabilon-d'Her)
Evrot, J. 204
Evstifejeff 666
Eyama t. 283
Ezopo 47, 196
Fabo 207
Falkenhahn, V. 64, 121
Falkonbriĝ, G. 151, 152
Fasce, E. 217
Faulhaber, F. 58, 182, 225, 269
Fauvart-Bastoul 58
Faux, D. 74
Fekete, I. 60, 215
Feldman-González, R. 185, 448
Fénelon 139, 206
Fenton; W.H. 216
Fernández, A. 242, 266
Fernández-Flórez, W. 214
Fernández-Menéndez, M. 188, 214, 254, 255, 486, 766, 769, 772
Ferri, E. 262
Ferrière, A. 270

Fersman, A. 255, 265, 266
Ferter-Cense, E. 206
Fethke, J. (ps.: Jean Forge) 158, 160, 179, 241, 242, 331
Fetisov, M. 232
FeZ (ps. de Felix Zamenhof)
Fiblango (ps. de F. Blangarin)
Ficowski, T. 228
Fiedler 214, 237
Filatov 233
Filip, J. 165, 301
Filip, K. 165
Filipov G.M. 729
Filliâtre, R. 288
Finot, M. 266
Firu, P. 230
Fischer, O. 479
Fischer, W. 209
Fischer-Galatz, H. 498
Fisher, D.C. 270
Fišer, A. 142, 197, 231, 232, 444
Fitzgerald, E. 226
Flageul 276
Flammer, W. 255, 257, 290
Flamo, J. (ps.) 163, 165
Flaubert 206
Flego, S. 217, 323-325, 327-329, 331, 332
Flego-Ravšelj, J. 332-333
Fleischer 255
Flint, T. 225
Flood, D. 235
Flourens, J. (ps.: Roksano) 139, 143, 206, 231
Flügel, J.C. 444, 671
Flygare-Carlén, E. 235
Fogazzaro 219
Földes, J. 215
Foote, A.D. 52, 172
Forchhammer 754
Forel, A. 260
Forge, J. (ps. de J.Fethke)
Forst de Battaglia 267
Förster 305
Forster, E. 214
Forster, P.G. 444, 455, 456, 506
Foscolo, U. 217
Fournier d'Albe, E.E. 467
Fox, G. 278
Fradier, G. 272, 777
Fraenkel 273
France, A. 207
Francis, J.I. 119, 120, 169, 171, 179, 186, 188, 301
Francisko (sankta) 217, 219, 257, 278
Franco, F. 382, 465, 710
Frangulis, M.A. 27
Frank, A. 225
Frashëri, K. 192, 278
Frazer, T. 180
Fréchet, M. 266, 512, 613
Frederiko la 2-a (reĝo) 6
Fredro, J.A. 228
Freitas, J. de 271
Freitas, M. de 208, 229, 271, 273, 277, 278
French, R.J. 52, 180
Frenkel, R. 136, 231
Frerking, W. 322
Freto, D. 173
Frey, R.M. 341, 679
Fried, A.H. 449, 530
Fries, W. 63
Friis, L. 70, 202, 459
Frode, O. 235
Frodelund, H.P. 202
Fröding, K. 195, 255
Frollo 66
Frug, A.G. 221
Fruictier, P. 57, 58, 140, 250, 271, 291, 293
Fuchs 214
Fujisaŭa kosecu 219
Fukuta kunitaro 142, 177
Fukutani 268
Fulgosi, S. 325
Furler, H. 780
Furmanov, D. 233
Futabatei ŝimei 470
Gabrielli, L. 183
Gacond, C. 485, 486
Gadd, E. 511
Gajdar, A. 233
Galilei, G. 278
Gallon, T. 193
Galloway, P. 195
Gambier 144
Gandhi 278, 494, 684
Garaŝin 489
García, R. 766
García-Lorca, F. 212, 214, 323
Gardonyi, G. 215
Garŝin, V. 231, 232
Garzón-Ruiz, J. 142, 256
Gasiorowski 228
Gasse, E. 206, 256, 278
Gassy, M. 661
Gavrilov, P. 263, 721
Gazda, V. 200
Genez, L. 325
Genthon, I. 275
Genuit, F.H. 693
Geoghegan, R. 66, 454
George, H. 278
Georgiev, I.S. 174
Georgievskij, P. 59
Gerasimov, M. 232
Gerdman, B. 273, 292
Gernet, Vl. 138, 208, 231, 293, 295
Gesell, S. 271
Gething, W.A. 74, 292, 593
Gezelle, G. 204
Ghanem, S. vi, 495
Ghosh, S.K. 747
Giacosa, G. 216, 219
Giani 507
Gibczyńska, J. 329
Giedra, B. 148, 224
Giessner, J. vi
Giesswein, A. 466
Gilbert, W. 56, 529
Gille 264
Gilli 267
Gim taekeng 476
Ging fan 201
Ginz, O. 200, 211, 240, 290
Giunio, P. 268, 343
Giusti, G. 216
Givry, de 292
Gjivoje (Givoje), M. v, vi, 55, 178, 222, 253, 268, 507, 746
Glasstone, S. 267
Glück, J. 277
Godek, I. 474
Goebbels, J. 705, 706, 714

Goethe, J.W. 128, 146, 208, 210, 322
Gogitidze 206, 222
Gogol(j), N.V. 128, 142, 231, 246, 322
Göhl, G.H. 142
Goldberg, M. 132, 133, 293
Goldfeder, Ŝ. 233
Goldoni, A. 183
Goldoni, C. 217, 219
Goldsmith, C.C. 439-442, 552, 586, 588, 592, 593
Goldsmith, O. 192, 322
Göltl, A. 214
Gomes Braga, I. 260, 277, 454
Gonin, R. 515
Goodall 244
Goodes, W. 448
Goppel, L. 210
Gordon 193
Gorkij, M. 135, 231, 233, 246, 278, 331
Görlich, E.J. v
Gorov, G. 199, 273
Goya 277
Gozzi, G. 219
Grabowski, A. 47, 66, 132, 133, 136, 190, 196, 208, 217, 226-228, 231, 237, 238, 240, 277, 300, 480, 481, 665, 666
Graf, A. 219
Granados 331
Grandja 711
Grattapaglia, G. vi
Grau-Casas, J. 150, 151, 175, 223, 238, 666
Graur, A. 498, 745
Graversen, C. 202, 255, 271
Grazzini, C. 470
Gregor, D.B. v, 58, 64, 121, 196, 256, 668, 803
Grenkamp (ps. de Salo Kornfeld)
Grgurina, A. 183
Grigorov, A. (ps.: Ljubin) 154, 163, 179, 199, 277
Grillparzer 142, 209
Grimm (fratoj) 209, 247
Grimsson, K. 242
Grňa, J. 199
Grosjean-Maupin, E. 57, 71, 72, 166, 260, 283, 665, 666
Groszkowski, J. 482
Grum, J. 180, 182, 229, 301
Gual, A. 223, 322
Guérineau, A. 502
Guéritte 270
Guillaume, J. 585, 588, 693
Guillot, J.P. 693
Gumá, S. 175
Gundulić 222
Guo moĵuo 201, 491
Gurov, J. 721
Gusev, K. 176, 214, 233, 235
Gustafsson, K. 235
Guterman 482
Guzevičius 732
Gyuris, G. 55, 680
Ĝibran', Ĝ.Ĥ. (Kahlil Gibran) 197, 255
Ĝuĝev, S. 56, 265, 329, 330, 684
Haas 473
Haazen, J. 63
Habellok, G. 285
Hackett, W.D.B. 475
Haefker, H. 271
Haferkorn, R. 281, 291, 292, 668, 674
Haga hideo 259
Haggard, R. 193
Hagler, M.G. 189, 254, 488
Halbedl, A. 256, 278, 529
Halka 215, 240
Hall, Herschell 141
Hall, Hilma 203
Hallstein, W. 781
Halvelik, M. 126, 266, 270
Hamaker 272
Hamann 276
Hamernik, S. 328
Hammer, J.K. 70, 291
Hamsun, K. 226
Han, W. 504
Hankel, M. 52, 119, 137, 143, 144, 300, 314
Hanotaux, G. 750
Hansen, H.C. 382
Harabagiu 314
Hardcastle, F. 193
Hardman, D.R. 94
Harry, R. 291, 449, 505, 512, 613, 683
Hasegaŭa tacunosuke 470
Hasegaŭa teru 162, 220, 244
Hašek, J. 200, 645
Hasselrot, A. 52, 137
Hata masajo 219
Hatterslev, M.C. 271
Hattori tôru 155, 219, 267
Haudebine, M. vi, 273, 361, 471, 493, 494, 626
Hauff, W. 209
Haugen, E.A. 226
Haupenthal, R. v, vi, xxx, 55, 58, 248, 677, 680, 804
HaverSchmidt, E. 686
Havlíček Borovský, K. 200
Hawthorne, N. 195
Hayashi 268
Hayes 195
Hebbel, F. 209, 210
Heck, A. 337
Heer, J.C. 210
Hegeler, I. 269
Hegeler, S. 269
Heide, Z. 183, 185
Heiligstein, N. 713
Hein, P. 202
Heine, H. 127, 128, 146, 166, 168, 190, 205, 208, 210, 685
Heiss, H. vi
Heitmüller, H. 210
Hekler, A. 275
Helleboid, L. 665
Helmuth, F.E. 782
Heltai 215, 248
Helte 266
Hemert-Remmers, J. van 183
Hemon, R. 223
Henry, C. xxv, 408, 674
Herben, J. 199, 200
Herczeg 214, 248
Hernández, J. 214

Hernández, L. 212, 214
Herriot 758
Herrmann, I. 200
Herrmann, W. 510, 591, 614
Heršak, Z. 325
Hertz, H. 202
Hervé, G. 262
Herzl, T. 274
Hess, J. v, 448
Hess, R. 705, 709
Hesse, H. 149
Heydrich, R. 703, 705-710
Heyerdahl, T. 247, 272
Heyrovský, J. 781
Heyse, P. 142, 209
Hibbert, G.K. 258
Hie kiguj 201
Hildebrand (ps. de Beets, N.) 225
Hillebrecht, G. 209
Hiller, F. 165
Himmler, H. 463, 703-705, 708
Hiraoka 272
Hirsch 255
Hitler, A. 650, 679, 702, 720, 746
Hitrov, P. 144, 232
Ho chi minh 236, 263, 278
Ho phuong 236
Hoang minh Giam 502
Hodakowski, T. 229, 481
Hodler, H. 140, 144, 206, 209, 260, 277, 295, 300, 365, 417, 424, 425, 429-432, 435, 437, 440, 445, 485, 534, 579, 631, 636, 639, 685
Hoen, N.G. 277, 533
Hoffmann, E.T.A. 209
Hoffmann, H. 60, 209
Hoffmann, J. 274
Hohlov, N. 56, 119, 154, 165, 193, 232, 233, 803
Hollitscher, W. 121
Holmes, H.W. 445, 591, 593, 612, 614-616
Holmkvist, G. 529
Holst, J. 224
Holzhaus, A. 274, 277, 427
Homar, F. 152
Homero 196
Honda katuiti 273
Hônen (sankta) 279
Honfan 201, 241
Hong hengwi 471, 476
Hoog, H.A. de vi, 56, 58, 526, 533, 668
Hoppe, R. 257
Horaco (Horatius) 224
Hori ŝoiĉi 268, 273
Horrabin 272
Horst, M. v.d. 547
Horthy 466
Houssaye 206
Hove, van 204
Höveler, H.F. (ps.: Ĉefeĉ) 58, 67, 142
Hovorka, N. 149, 152
Hromada, R. 200, 434
Hruševskyj, M. 271
Hrynkiewicz, A. (ps.: Diego Selso) 119, 175, 212, 214, 283
Hube, W. 679, 693
Huberteno 290
Hübner, P. 526
Hueter, C. 76
Hugo, V. 207
Huĝii mazumi 219
Hujucz 491, 492
Hukuta masao 183, 277
Hulst, W.G. van de 225
Hunnes, L.K. 226
Huntington, E.V. 265
Huot-Sordot, L. 283
Hus, J. 278
Huu-mai 236
Huynh-ba-Duong 502
Hvězdenský, V. 151
Hyams, H.B. (ps.: Tagulo) 141
Hyde, A.M. (ps.: Delsudo) 272
Hymans 750
Ĥavkin, N.B. 468
Ĥesapĉiev 199
Ĥolopov, A. 737
Ĥrima, Ĥ.M. 154, 163, 199, 645
Ĥrisostomo (sankta) 258
Ĥruŝĉov, N.S. 734
Ĥvorostin, S.K. 746
Ibsen, H. 225, 323
Ignotus, Coronel (ps. de José de Elola)
Ihara saikaku 220
Immermann, K.L. 210
Incertov, N. 721, 732
Indra, T. 240
Inglada-Ors, V. 137, 143, 144, 211, 212, 222, 300, 666
Inman 192
Ionesco, E. 323
Ionesku 262
Irving, W. 195
Isaac, N. 183, 504
Isac, E. 230
Isbrucker, J.C. 225, 478, 528
Isbrucker, J.R.G. 58, 225, 266, 270, 445, 507, 665-668
Isiguro teruhiko 220, 241, 262
Isii mamine 259, 279
Iskrov, Ĥ. 199
Isobe syôsaku 220
Iŝiguro namiko 473
Itabasi koh 268
Ith, H. 270
Ito kiuzo 262
Ito saburo 155, 176, 201, 219, 240
Itoo daisuke 332
Itoo eizo 341
Ivanov 489
Izgur, E. 60, 254, 264, 265, 645, 662
Jabłońska, I. 60
Jakob, H. (ps.: Agricola) 55, 230, 272, 290, 433, 434, 438, 439, 442, 445, 485, 552, 585, 587-589, 593, 596
Jakovlev, N.T. 739
Jakubcova, M. 224, 241
Jamamoto juzo 219
Jandlová 200
Janjić, F. 221
Jansson, S. 240
Janton, P. 803
Jaroslavskij, E. 256, 278
Jastrun, M. 229, 277

Jaumotte, M. 58, 207, 238, 451, 453, 616, 617 686
Jaunvalks, E. 224, 238
Jaurès, J. 635, 700
Jauŝkin, A. 528
Javal, E. 58, 268, 420
J.B.A. 273
Je laj-ŝi 491, 492
Jean, R. 206
Jegorov, D. 133
Jeĵov 730, 732
Jelušić, M. 167, 218, 221
Jensen, H.E. 202
Jensen, W. 202
Jensson, A. 479
Jerome, J.K. 193
Jerusalmi, N. 211
Jesenin, S. 233
Jespersen, O. 422, 459
Jesuo Kristo 278
Jevsejeva, L. 148, 152
J.F.M. 272, 275
Jiménez-Loira, A. 212
Jodko, A. R. 232, 265, 662
Joels, J. 229, 278
Johano la 23-a (papo) 257
Johansen, D. 226
Johansson, M. 264
Johns, E.J. 254
Johnson, W.B. 149
Jókai, M. 214, 248
Jonas, F. 382, 450, 452, 628, 648, 659, 660, 662, 679, 780
Jong, A.M. de 225
Jong, S.S. de 208
Jordanova, R. 329
Joseph, H. 494
Jost, K. 149
Jovanović, J.P. 473
Jovkov, J. 197, 199
Jozičić, A. 221
Jui ĉunoŝin 262, 473
Jukaŭa (Yukawa) hideki 781
Juliana (reĝino) 382
Julieta (ps.) 273, 361
Junck, R. 137, 216
Jung, C.G. 156
Jung, T. 58, 119, 149, 161, 186, 267, 294, 295, 440, 478
Jurysta, I. 221
Justesen, P.T. 161, 202
Ĵen ĵudi 273
Ĵirkov, L.I. 56, 423, 445, 650, 661
Ĵivkov, T. 263
Kääriäinen, E. 684
Kabanov, N. 231, 232
Kabe (ps. de Kazimierz Bein)
Kádár, I. 337
Kajam, O. 166, 226
Kaĵi hirokazu 219
Kaĵino joŝiko 341
Kákoš, J. 200
Kalidasa 211
Kalinin 167, 649, 721
Kalisky 195
Kałocsay, Kálmán (Kolomano) 57, 58, 63, 72, 117, 119, 126, 139, 144-146, 152, 166, 168, 186, 195-197, 199, 205, 207, 208, 210, 213, 215, 217-219, 224, 229, 230, 238, 240, 275, 277, 300, 301, 466, 803
Kamarýt, S. 200, 240, 286, 458, 671, 746
Kamilarov, E. 328
Kampmann, V. 382
Kanamatu kenryô 155
Kaneko joobun 219
Kanguruo (ps.) 185
Kant, I. 254
Kao, J.B. Se-ĉien 448, 504
Kaplan 151
Kapustin, L. 256
Karaslavov, G. 197, 199
Kardec, A. 260
Karinthy, F. 147, 159, 215
Karnobatlova, B. 328
Karolczyk, S. (ps.: Eska) 136, 144, 228
Kärt, B. 176
Karvaš, P. 200
Kassák, L. 215
Katarina la 2-a (imperiestrino) 6
Kato seiiĉi 269, 289, 520
Kaus, M. 269
Kautsky, K. 724, 738
Kavenius, N. vi, 518
Kavka, J. 287
Kawabata yasunari 220
Kawamura sin'itirô 254, 268
Kawasaki naokazu 56, 270, 283
Kazbek 222
Kazi-Girej, N.A. 138, 231
Kažoks, A. 148, 300
Kearney 192
Keith, A. 268, 272
Kekkonen, U. 382
Kellerman, I. 192, 193
Kempeneers, P. 552, 585, 587, 593, 596
Kempis, Thomas a 257
Kennedy, D. 102, 552, 585, 586, 588, 589, 592, 596
Kennedy, M. 102
Kenngott 165
Kerckhoffs, A. 123
Kerelezov, G. 325
Keremidĉiev-Esperov, I. 519
Khun, J.F. 278
Kian hjuan-tong 490
Kikau, P. 224
Kikuĉi kan 219
Kilian, T. 199
Kim, V.E. 476
King, W.H.v
Kiril (patriarko) 781
Kirjuŝin, P. 662
Kirk, H. 202
Kisházi, Ö. 382
Kita satori 183
Kitabatake ĉikafusa 220
Kitzler, L. 57
Kivi, A. 203
Klein, A. 486
Kleist 210
Klemola, I. v, 506
Kliemke, E. (ps.: Nienkamp) 142, 533
Klimas 224
Kling-Klang (ps. de Marenĉin)
Kljaković, V. 323, 325, 328

Kloek, A. 662
Kloepffer, W. 210
Knjažinskaja-Lapenna, L. vi, 76
Knoedt, L.H. 52, 173, 229
Kobajaŝi cukasa vi
Kobylinski, H. 271
Kobo 235
Koch, H. 277
Koch 224
Kocjubinski 235
Kock, E. de v. De Kock, E.
Kofman, A. 66, 132, 133, 137, 192, 196, 204, 208, 293, 295
Kohen-Cedek, J.J. 152, 211
Koñ, A. 235
Kojc, M. 247, 270
Kökény, L. 56, 276, 445, 458, 507, 670, 738, 803
Kolar-Krom, F. 221
Kolari, V. 460
Kolčinskij, V. (ps.: Elsudo) 262, 265, 278, 662, 722
Kolev, P.A. 662
Kolowrat, G. 58
Kolowrat, N. 143, 254
Komenský (Comenius), J. A. 25, 26, 277
Konfucio 259
Konisi gaku 183, 220, 273
Konopnicka, M. 228
Konstantinov 246
Koo, W. 491
Kools, A.H.M. 216
Korczak 228, 247
Kordylewski, K. 320
Kořínek, J. 175, 200, 301
Korinna, L. 266
Körner, T. 209
Kornfeld, S. (ps.: Grenkamp) 57, 151, 161, 228, 254, 274, 275
Korolenko, V. 231-233, 295
Korotkij, M. 235
Koser, L. 473
Kostecki 481
Kostov, S.L. 325, 326
Košinaka hirosi 177
Kotarbiński, T. 482, 682
Kotzin, B. 142, 232
Kovaĉev, I. 199
Kovačić, I. G. 178, 222
Kovero, M. 271
Kozlevčar, J. 60, 74, 221, 222, 713
Kozłowski, C.J. 119, 136
Krag, J.O. 781
Kralj, D. 60, 119, 189
Krestanov, I. 197, 199, 238, 272, 273, 340, 456
Kreuz, R. 274, 287, 288, 356, 434, 438, 439
Krikortz, S.E. 235
Krilov 232
Krishnamurti, J. 255
Kriss, J. 136, 144
Kristjansson, O. 272
Kritz, R. 211
Krleža, M. 222, 325, 331
Krogstie, P.J. 286
Kronenberg 481
Kropotkin, P. 262, 278, 637, 645
Kruit, W.F. 225
Krysta, L. 58, 165
Kubo 268
Kucharský 286
Kudela, A. 167
Kuhl, B. 228
Kühnl, F. 534, 666
Kulišev, G. 780
Kun, B. 263
Kunovski, F. de 276
Kunschert 268
K'uoan 201, 259
Kurisu kei vi, 244, 245, 732
Kuroda masayuki 177
Kuroita kacumi 470
Kürsteiner, H. 442, 485, 552, 612
Kurzens, N. 148, 152
Küster 208
Kušnir, N. 230
Kuzjma 271
Kuzmiĉ, V. 722
Kvist, K. 529
Labáth, J. 178
Labbé, P. 122
Labiche, E. 322
La Colla, S. 166, 308
Ladevèze, R. de 445
Laemmle 331
La Fontaine 206, 207
Lafontaine 750
Lagerlöf, S. 234, 235
Laigner 275
Laiho, L. 272
Laisant, C.A. 140, 266, 662
Laisney, R. 257
Lajarte, R. de 666
Lakov, A. 199, 738
Lakŝmi Narasu, P. 279
Lalikov, S.K. 233
Lambert, C. 58, 140, 270, 300
Lambert, D. 142, 192
Lange, A. 211, 228
Lange, O.C. vi
Langer 246
Langgaard, K. 202
Langlet 135, 138, 293, 483
Lansel, P. 230, 272
Lanti (ps. de Eugène Adam)
Lapenna, E. v, 76, 184, 315, 316
Lapenna, I. iii, iv, vi, xxxi, 27, 44, 53, 56-58, 62, 64, 73, 76, 86, 92, 121, 186, 188, 241, 242, 248, 253, 270, 275, 301, 314, 317, 318, 326, 327, 330, 339, 341, 343, 368, 383, 398, 406, 410, 440, 443, 445, 460, 474, 486, 501, 510-512, 522, 538, 552, 585, 588, 589, 591-593, 596, 599, 606, 614, 617, 623, 625, 628, 634, 670, 682, 683, 689, 711, 746, 763, 767, 782, 783, 791, 803
Lapienė, P. 224
Larglantier, G. 350
La Rochefoucauld 166, 207
Laskin 272
Lassalle, F. 262, 637
Last, J. 225
La Torre, M. 70
Laugier, H. 768
Laurat, L. vi, 654, 656, 662, 683, 747
Laŭlum 201, 241
Laval, R. 662
Lavrenev, B. 233
Law 212

Łazica 481
Le duan 264
Leau, L. 422, 803
Lebar, P. 598, 766
Le Brun, P. 208
Lebrun, V. 244
Lederer, S. 142, 209
Lee, J.A. 264
Leemans, V. 780
Leenhard, A.H. 175
Leeuwen, H.C. van 225
Lefebvre 276
Legrand, Enrique (Henri) 207, 212, 486
Legrand, R. 662
Lehtivaara, S. 331
Leibniz, G.W. 6, 25, 26, 254
Lejzerowicz, I. 164, 221
Lekko, A. 203
Łekowski 481
Lemaire, C. 273, 452
Lemaire, R. 137, 286, 295
Lemaitre, J. 247
Le Monnier 267
Lengyel, P. de 52, 139, 214, 266, 293, 295, 466, 666
Lenin, V.I. 262, 263, 278, 645, 650, 723, 724, 731, 733, 741
Lenner, A. 240
León, L. de 212
Leopardi, G. 219
Leppäkoski, J. 203, 205
Lermontov 230, 233
Lesage 207
Leser, J. 180, 301
Lessing, G.E. 6, 142, 209, 322
Leszkó, M. 215
Leunbach 142
Levin, R. 207
Levstik, F. 60, 221
Lewesdon, J. 274
Lewin, M. 289
Lewin, R.A. 195, 684
Lewine, J. 782
L'Hermitte, R. 747
Liebeck, S. 287, 483, 510, 533
Liebesny, F. 24
Liebknecht, W. 262, 637
Liem, Tjong Hie 216, 225, 505
Ligorio, A. de 216
Liljer (ps. de Logvin)
Limburg Brouwer, van 225
Limones, R. 143
Lin biaŭ 264
Lindbom, T. 264
Lindhagen, C. 483
Lingua, H. 81
Linnankoski 203
Lins, U. iii, iv, xxx, 616, 617, 662, 677, 747
Linton, K.G. 272
Liouville, J.M. 545
Lipovac, J. 325
Lippe, E. 224, 241
Lippmann, W. 58, 665, 666, 668
Liszt, F. 327, 331
Litauer, J. 510
Liu bejü 201
Liu ĝaŭlin 201
Liventhal, N. 156
Ljubić 266
Ljubin, M. (ps. de Grigorov)
Llech-Walter, C. 208
Llech-Walter, R. 589, 591, 614
Lobut, P. 175, 208
Löfvenmark, G. 235
Logvin, A. (ps.: Liljer) 174, 235
Lojko, I. 47, 133, 196, 293
Lojko, V. 231
Lokman la saĝa 197
Lo Martire, E. 327
Lomonosov, M.V. 6
Lomtev, T. 738
London, J. 195, 645
Loon, H. van 273
López-Escartín, N. 214, 255
Lorenz, F.V. 137, 152, 173, 211, 229, 240, 259, 457
Lorenzini, C. (ps.: Collodi) 217
Louis, R. 302
Louÿs, P. 204
Löwe 278
Loyola, Ignacio de 212, 257
Lubojański, J. 274
Luchaire 756, 757
Luczenbacher 214
Ludoviko 262
Lugagne, G. 288
Luiscius (v. Stipriaan Luiscius, J.M. van)
Lukács, J. 341
Lukaĉevskij, A.T. 256
Lukáš, M. 151, 168, 174, 199
Lunaĉarskij 650
Lundberg, G. 256
Lundberg, J. 264
Lundmark, K. 684
Lundqvist, F.T. 183
Lundqvist, K. 183
Lusin 201, 491
Luther, M. 257, 278
Luu quy ky 274
Luxemburg, R. 278, 655
Luyken, H. 162, 526
Maas, H.D. 266
Mabesoone, P.M. 589, 591
Macaulay, T. 192
Mačernis, I. 224, 256, 264
Machado, A. 214
Macheiner, E. 452
Machiavelli, N. 326
Macho, A. 292
Maclean, N. 212
Macmillan, M. 17
Madách, I. 146, 215
Maddern, I. 449
Maeda t. 267, 287
Maertens, G. 686
Maeterlinck 206
Mahé, J.L. 332, 333
Mahen, J. 199
Mahn, G. 260
Maimon, N.Z. 427
Mair, A. 58, 210, 242,
Maistre, X. de 204, 254
Maitzen, H.M. 320
Majakovskij, V. 115, 233, 246
Majnov 47, 230
Makay, L. de 215, 295
Makkinje, P.J. 225
Makkink, G.F. 57, 254,

267, 513, 674
Malaĥ, L. 221
Malfeliĉulo, I. (ps. de Ŝirjaev)
Malgorn, G. 290
Malheiro 278
Malík, A. 720, 735
Mallia, C. vi, 496
Malmanche, A.L. 268, 285
Malmgren, E. xxv, 86, 235, 440-442, 484, 552, 562, 585, 588, 589, 591, 592, 596, 612, 791
Mamin-Sibirjak, D.N. 232, 233, 246
Mamužić, M. 221
Manders, W.J.A. 56, 58, 121, 196, 254, 803
Mangada-Rosenörn, J. 150, 151, 161, 175, 212, 214, 238, 255, 272, 496, 710
Mann, W. 193, 255
Mannevy 266
Manzoni, A. 216, 217, 219
Marchesi, M. 217
Marchlewski, J.B. 271
Marenĉin, Z. (ps.: Kling-Klang) 255
Maresquelle, H. 260
Marich, A. 141, 214, 237, 466
Marignoni, D. 66, 468
Mařík, J. v
Marini, B. 248
Markarian, R.H.M. 60, 70, 86, 91-93, 407, 517, 674, 804
Markowsky, T. 329
Marr, N.J. xxii, 121, 270, 725-727, 729, 737, 738, 741-743, 747
Marriott, E. 277
Marriott, R. 277
Maršak, S. 235
Martinet, A. 64, 121
Martínez-Trueba, A. 769
Martins de Castro, A. 229
Martinus 247, 255, 309
Márton, L. 511
Martos, S. 235
Maruzzi, D. 85, 474
Marx, K. 147, 262, 278, 638, 645
Masaryk 278
Mascagni 331
Masterman, K. 523
Mastný, J. 167
Matković, M. 323, 329
Matkowski (Matwiejczuk), E. 154, 168
Mattos, G. 126, 173, 182, 184, 191
Matuba kikunobu 186, 220, 245, 248, 267
Matubara a. 290
Matwiejczuk, E. (v. Matkowski)
Matzinger 276
Maul, S. vi, 185
Maupassant, G. de 206, 208
Maura, G.E. 150, 152, 168
Maurois, A. 207
Maŭ dun 491
Maŭ zedong xxix, 254, 264, 274, 491
Maxwell, E. 193
Maynar, R.E. 212, 257
Mayr 276
Mazje, A.-M. 468
Mažuranić, I. 221, 222
Mazzini, G. 217, 255
Mazzolini, A. 150, 217, 287
McCall, T. 382
McCarthy, J.A. 267, 289
McCormick 268, 272
Medem, P. 142, 232
Medrkiewicz 277
Mees 225, 262
Mefi(s)tofilo (ps.) 185
Meier, L.E. 137, 142, 209
Meillet, A. 3, 27, 30, 32, 640
Meisinger, J. 709
Melamed, E.C. 468
Melckebeke, R. van 144, 204
Mendelejev 266
Mendes, V. 277
Menu-de-Ménil, F. 63, 140, 289, 300, 424
Menu-de-Ménil, S. 140
Méray, C. 140, 250
Merchant, J. 162, 277, 432
Merckens, M. 142, 206, 291
Méric, A. 780
Mérimée, P. 206, 207, 247
Merrick, F. 289
Merwe, N.J. van der 483
Metastasio, P. 219
Methling, F. 330
Metzger, M.J. 450
Mevo (ps. de R. Orengo)
Mexin, A. 232
Meyboom, F. 269, 289
Meye, R. 162
Meyer, S. 52, 137, 139, 204, 206, 207, 254, 255
Micard, H. 691-693
Michalski 482
Michaux, A. 417, 422, 461, 510
Mickiewicz, A. 133, 226, 228, 229, 247, 277, 482
Middelkoop, A.J. 189
Midthus, H. 479
Migliorini, B. 217
Migliorini, E. 217
Mihályfi, E. 273
Miĥalski, E. 115, 119, 153, 154, 645, 650, 721
Mijake ŝihej vi, 70, 155, 208, 471, 743
Mikami teruo (ps. de Nakamura t.)
Miklas, W. 679
Mikszáth 214, 248
Mildwurf, A. 287
Milev, G. 199, 246
Miličević, B. 222
Milčinski 222
Milivojević, D. 325
Millidge, E.A. 67
Mills, A. 269
Milne, A.A. 195
Milojević, S. iv-vi, 504
Milsom, M. (ps.: Ramo) 140, 193
Milukov, P. 272
Milward, F. 193, 195
Mimó-Espinalt, L. 58
Minnaja, C. v, 318, 320, 523

Minnaja, L. 217, 224
Minnaja, N. 320, 538
Minor, K. 165, 209, 666
Mirbeau, O. 206
Mirski, B. 136, 230
Misak, S. 161, 273
Mistral, F. 230
Mitev, V. v
Mitterrand, F. 781
Miyamoto masao v, vi, 56, 74, 163, 177, 183, 186, 218, 220, 241, 244, 245, 301, 506, 663, 747
Miyatake seidô 271
Miyazawa kenzi 60
Mladenov, G. 325
Moberg, K.J. 288
Moch, G. 58, 140, 206, 207, 260, 289, 460, 461, 477, 530, 665, 666
Modrijan, F. 58, 161, 221
Moebusz, A. 142, 445
Moerbeek, R. vi
Molière 128, 184, 206-208, 322, 323
Moll, J.W. 285
Mollet, G. 781
Molnár, F. 215, 323, 329
Molotov 263, 650
Moniuszko, S. 228, 322
Monti, P.C. 217
Montrosier (ps. de Capé)
Mora-i-Arana, G. 175
Morariu, T. 78, 161, 230, 341, 484, 498
Moratín, L. 212
Morawetz, F. vi, 259
Mori oogai 220
Morin, F.A. 496
Moritz, U.J. 273, 617
Moroi zyôzi 220
Morrison, W. 192, 193
Morton, M. 322
Most, J. 256
Motteau, A. 142, 192
Mounin, G. 248
Mrázková 200
Muço, G. 192, 278
Mučnik, I. 221, 468
Mudrak, W. 506
Muffang 206
Muhamad 258
Müller, M. 277
Müller, Max 31
Multatuli (ps. de E.D. Dekker)
Munniksma, F. 288, 358, 689
Muns, D. 179
Munthe, A. 193
Münz, A. 210
Murakami tomojuki 219
Murata keinosuke 177
Murata m. 519
Muravkin, H. 254, 721
Murgin, C. 55, 176, 506
Murphy, F.D. vi, 533
Murray, G. 754
Muschamp 195
Muschler, R.C. 210
Musella, V. 176
Musset, A. de 139, 206, 207
Musset, P. de 206
Mussolini, B. 217, 271
Mybs, E. 142, 666
Nacume sooseki 219
Nagayo yosio 220
Nagy, I. 290
Najmanovič, N.H. 467
Najivin 232, 233
Nakacuka kičiji 718
Nakagaki kojiro 161, 196, 245
Nakamura kijoo 266
Nakamura tazuo (ps.: Teruo Mikami) 58, 70, 72, 177, 186, 220, 259, 260, 272
Nakazima atusi 220
Nałkowska, Z. 229
Nansen 278
Narasimhan, C.V. 782-784, 787, 789
Narciso (ps.) 197, 238
Nash, G.D. 149
Natalis, E. 337
Nathans, N. 645
Nattan-Larrier 260
Naumann, A. 133, 293
Naville, E. 250, 254
Nederland, O. 70
Nedeva, K. 325
Neergaard, P. 55, 58, 73, 188, 241-243, 254, 267, 268, 285, 292, 308, 338, 339, 459, 495, 513, 533, 645, 668, 674, 683, 684
Nekrasov, N.V. 56, 119, 144, 153, 154, 232, 233, 265, 273, 489, 644, 662, 721, 725, 731, 803
Němcová, B. 246
Németh, G. 273
Nemirovič-Dančenko 231
Nemoto k. 286
Nenjo Rimanto (ps.) 60
Neruda 246
Nervo, A. 214
Nery, F. 229, 278
Nestroy, J. 210
Neumark, E. 211, 213
Neupert 295
Neužil, A. 167
Newell, L.N.M. 149, 152, 156, 160, 168, 193, 195, 301, 504
Ney, F. 258
Nguyen huy tuong 271
Nguyen khac vien 271
Nguyen kong hoan 236
Nguyen phuoc khang 505
Nguyen sang 236
Nguyen van kinh 503
Nguyen van troi 278
Nielsen, J. 768, 770
Nielsen, R.G. 518
Niemojewski 228
Nienkamp, H. (ps. de Kliemke)
Nieuwenhuis, D. 262
Nievo, I. 216
Ninošvili 222
Nishi seiho 219, 268, 269, 512, 520, 613
Nisi ken'itirô 268
Nisida ryôya 259, 279
Nisikawa 268
Nisimura masao 155
Nišimura koogecu 259
Nišio suehiro 781
Nitobe inazo 84, 751, 752, 758, 759
Nitti, F.S. 274
Nixon, V. 102, 517

Noël, E. 141, 192, 196, 206, 224, 230, 254, 267, 283
Nogueira, R.P. v, vi
Nohara kiuiĉi 201, 211, 219, 259, 271
Noll, M.C. 451
Nordenstreng, R. 267
Nordensvan, K.M. 52, 137, 138
Nordmann 266
Norway, G. 193
Novák, A. 200
Novák, J. 277
Novejarque 212
Novikov-Priboj 233, 246
Novobilský, V. v, 119
Nozima yasutarô 60, 220, 245
Nüchter, F. 277
Núñez-Dubús, A. 151, 152, 168, 214
Nušić, B. 222, 323, 325, 329, 331, 343
Nutters, W. 48, 302
Nyanasatta Thero 531, 533
Nylén, P. 58, 138, 235, 277, 293, 471, 483, 666
Oberrotman, A. 228
O'Connor 195
Odhe 264
Ogrizović, M. 221
Ogura toyofumi 246
Ojalo, J. v
Oka asajiro 470
Oka kazuta 177
Okakura kakuzo 260, 272
Okamoto joŝicugu 58, 271, 668
Okamoto rikiĉi 259
Okazaki reimu 259, 279
Okuda 268
Olav la 5a (reĝo) 479
Olevianus 257
Olevsoo, G. 275
Oliver, A.C. 552, 585-587, 592, 593, 596
Olsen, G. 479
Olson, O. 102
Olsson, E. 183
Olŝvanger, I. 152, 468
Omelka, F. 182
Onoda yukio 155
Ooki 285
O' Reilly, P.J. v
Orengo, R. (ps.: Mevo) 217, 469
Orloff-Stone, R. 255
Orriols, A. de 212
Orthal 365
Ortutay, G. 780
Orwell, G. 195
Orzeszko(wa), E. 128,226, 247
Osada arata 262
Oshima hiroshi 268
Osibov, I. 540
Óskarsson, I. 275
Osmond, E.L. 467
Ossaka kenji xxix, 58, 155, 176, 196, 201, 219, 220, 238, 241, 259, 271, 286, 470
Ostrovski, I. 231
Ostrower, A. 27
Ostrojnikova, E. 233
Ostubo 260
Ostwald 422
Osugi sakae 470, 637, 715
Ošida 289
Otčenášek, J. 200
Oterma, L. 266
Ovidius (Ovido) 139
Oyarzábal-Orueta, J. de 175
Ozre 265
Padfield, W.W. 260
Padulli, 216
Page, W. 526
Pagnol, M. 184, 208
Palaprat 204
Paluzie, J.L. 523
Panajott 214
Pancer, O. 253, 683, 684
Panĉ 246
Panĉen Lama 531
Panel 58
Paolet, A. 50, 143, 271, 469
Papazjan, V. 197
Papini, G. 217, 278
Papot, B. 206
Parini, G. 219
Parisot 58
Parrish, D. 340, 426
Paruzel, H. 276
Pascoli, G. 217, 219, 224
Passay, F. 260
Pätiälä, H. 526
Paŭlo la 6a (papo) 257, 525
Pavlović, B. 221
Pavlović, M. 152
Payson, E. 161, 193, 207
Pechan, Alfonz (Alfonso), 58, 119, 189, 292, 445, 525, 804
Peevski, V. 682-684
Pei, M. 29, 32, 487
Peixoto, S. 229
Pellico, S. 217, 255
Peltier, E. 141, 277, 525
Peneter, G.P. (ps) 148
Peneter, P. (ps) 148
Peng ĝen 264
Penn, W. 278
Penndorf, J. 196, 271
Perec, J.L. 221
Pérez-González, M. vi
Perrault 206
Perrenoud, W. 257
Peter-Ruetschi, T. 82
Peterlongo, G. 217
Petersen, A.H. 202
Petersen, K.H. 459
Petit, P. 552, 583
Petöfi, S. 146, 214, 215, 248, 701
Petrarca, F. 219
Petrin, J. 230
Petro la granda (imperiestro) 6
Petrović, P. 222
Petrović, S. 152, 222
Pettyn, A. 76, 80, 482
Peyronnet-Flego 76
Pfeffer, E. 224, 262, 268, 271, 282, 292, 486
Philippe, H. 693
Phillips, H. 486, 487
Píč, K. 175, 200
Pickel, L. 50, 309, 463
Pietrzak, M.W. 533, 538, 541
Pilger, W.F. 173, 547
Pill, E. 233

INDEKSO DE PERSONOJ

Pillath, F. (ps.: Zanoni) 142, 208, 210, 300
Piłsudski, J. 278
Pio la 10-a (papo) 278, 525
Pio la 11-a (papo) 257
Pióro, Jan 287
Pióro, Julia 180
Pirandello, L. 217, 323, 331
Piron, C. 175
Piron, J. 659
Pirro (ps) 123
Pisoni, G. 176
Pissarro 277
Pistoli, V. 192, 278
Pitlik, A. 340
Pizzi, F. 150, 217, 257
Platono 196
Plaŭto (Plautus) 224
Plehn, H.J. 288
Plunkett, J.M. 467
Podkaminer, S.N. 663, 722
Poe, E.A. 195
Pogačić, 221, 246
Poincaré, H. 305
Polakov, V.I. 153
Polasky 448
Polgár, I. 466
Poliŝĉuk, P. 176, 182, 235
Polivanov, E.D. 729
Poljanskij, S. 266
Pollhammer, J. 285
Pompilio, G. 76
Popescu, A. 230
Poplo, J. (ps.) 143
Popov, H. 456
Popova, K. 328
Popović, B. vi, 253, 339, 513, 684
Poposviĉi, A. 230
Porchat, J.J. 206
Porto Carreiro-Neto, L.C. 229, 260
Poruks, J. 224
Posenaer, M. 204
Postnikov, A.A. 499, 699
Postnikov, F. 137, 293, 295
Potts, B. 182, 264, 341
Pound, E. 115
Power, C. 320
Pragano, S. 230, 301, 498
Préaubert, E. 196
Prebil, L. 90
Prévost 206, 326
Price-Heywood, B. 149, 152
Pride, A. 195
Privat, E. 46, 52, 55, 57, 62, 72-74, 79, 85, 117, 118, 126, 135, 139, 141, 144, 186, 241, 242, 248, 272, 274, 275, 277-279, 295, 300, 314, 317, 321, 322, 340, 383, 414, 431-434, 436-438, 445, 485-487, 506, 528, 534, 612, 639, 666, 671, 683, 684, 699, 749, 759, 791, 804
Prohaskova, S. 325
Promet, L. 203
Proudhon 638
Prus, B. 226, 228, 247, 482
Przybyszewski 228
Pucinski, R.C. 488
Pujmanová 246
Pujulà-i-Vallès, F. 142, 143, 212, 223
Puketapu, W. 342
Pulvers, C. 209
Pumpr, T. 151, 168, 174, 198, 200, 287
Puskás, S. 341
Puŝkin, A.S. 142, 231, 232, 246
Quang loi 274
Quarello 58
Quentin, E. 290
Raabe, W. 209
Raadi, G.A. 768
Rabinovic-Tajc 211, 221
Racine 31, 206
Radaković, B. 184
Radek 246, 650
Raden, M. 341
Ragnarsson, B. v, vi, 172, 173, 216, 301, 494
Rainis, J. 224, 277
Rajczy 214, 237
Rajski, A. 614
Rakić 222
Rákosi 649
Rakuŝa, R. 60, 73, 270
Ramo (ps. de Maria Milsom)
Ramstedt, G.J. 54, 459
Ramuz, C.F. 206
Rand, M. 203
Randag, W. 260
Randrianasolo, G. 477
Rapley, J.C. 588, 589
Rappoport, S. 221
Rasku, E. 183
Rašan, Đ. 152
Raŝidov, Š. 235
Raveloson, E. 477
Ravensteyn, W. van 700
Ravila, P. 781
Ravšelj, J. 325, 332, 333
Recareo, L. 214
Recka, A. 247
Redondo-Ituarte, F. 150, 214
Régulo-Pérez, J. vi, xxix, xxx, 49, 50, 104, 166, 169, 188, 465, 674, 683, 685
Reiche, F. 254
Reiersøl, O. 266, 289
Reinits, D.G. 449
Reinke, J. 256
Reinking, A. 209
Remarque, E.M. 210
Rembrandt van Rijn 277
Renan, E. 206, 256, 278
Renard, J. 206
Renn, L. 650, 651
Renner, K. 264
Rethel 207
Rétot, M. 358
Reymont, W. 228, 247
Reynald, G. 755
Reynold, G. de 756
Reynold, J. 278
Rhodes, J. 58, 257, 277
Ribillard, J. 182, 244
Ribot 208, 273
Ricci, G. 156
Richard, J. 267
Richardson 525
Richet, C. 207
Richtie, H. 7, 27
Riis, G. 182
Rilke, R.M. 210
Rinĉen, Yöngsiyebu 489, 496, 497, 781
Rio Branco 754

Risør, W. 202
Ritterspach, G. 286
Ritz, H. 449
Rivier, A. 142
Rivoir, D. 217
Robert, E. 207
Robicsek, F. 263, 722
Robin, A. 295
Robin, G. 498
Robinson, K. (ps. de K.R. C. Sturner)
Robis, Ilarij of (ps. de Borisov)
Rodari, E. 185
Rodin, S. 180
Rodó, J.E. 214, 255
Rodó, L. 277
Rodríguez 76
Rodríguez-Huerta 465
Rodríguez-Sica, R. 269
Roelofs, W.P. 279, 513, 674
Rogelj, T. 178
Rogister 128
Rogulja, I. 325
Rohden, H. 229, 254, 278
Roksano (ps. de J. Flourens)
Roland-Holst, H. 278
Röll, L. 511
Rolland, R. 260, 372, 639, 640, 644, 649, 650
Roller 276
Rollet-de-l'Isle, M. 140, 288, 289, 291, 305, 434, 512, 665, 666
Rolt, W.F. 268, 287
Romains, J. 207, 322
Romanov 230
Romijn, J. 273
Roos 193
Roose, F. vi
Roosen, H. 290
Roost, M. 681
Rosbach, J.H. 180, 301, 315, 479
Rosher, E.M. 286, 288, 291
Ross, B. 272
Rosselli, A.M. 780
Rossetti, C. (Cezaro) 179, 244
Rossetti, R.M. 52, 119, 169, 171, 179, 188, 189, 195, 196, 241, 314, 315, 684, 685
Rossi, N. 176
Rossinyol, S. de 222
Rostand, J. 255, 267, 781
Rotkvić, I. 119, 167, 188, 218, 221, 222, 315, 668
Rousseau, C. 135, 287
Rousseau, T. 428, 430
Royer, C. 260, 295
Rozenstock, L. 481
Rozman, S. 325
Rublov, S.A. 153, 233, 255, 265, 266, 650
Rudelle, L. de 123
Rudnicki, S. 481
Ruff, K. 102
Runeberg, H. 202, 224
Rusinov, S. 272, 275
Ruskin, J. 193
Rust, B. 703
Rust, J.C. 142, 256, 258, 300, 533
Rutherford, J.F. 258
Ruus, N. 732
Rygg, O. 226
Rykov 733
Rytjkov, N. vi, 324, 328, 331, 342, 722, 723, 732
Saager 265
Sabadell, A. 222
Sacchetti, F. 219
Sadler, V. iv, v, 57, 73, 76, 172, 180, 290, 308, 327, 329, 339, 406, 504, 523, 619, 674, 682, 747
Sadoveanu, M. 230, 247
Saenz, I.M. 267
Sagard, G. 29
Saharov, A.A. 141, 238, 499
Saint-Exupéry, A. de 208, 330
Saint-Pierre, B. de 206
Saito hidekacu 716, 717
Sakai matutarô 245
Sakaria, H. 270
Sakellaropoulos, S. v, 196, 270
Sakowicz, R. 510
Sakrada iĉiro 219
Salas-Bonal, R. de 212
Salazar 710
Saldanha-Carreira, J. de 497
Salovaara, E. 180
Salzmann, M. 221
Samodaj, V. 233
Samojlenko, A. 282, 292
Sampson 193
Samyn, A. 52, 180, 184, 204, 301
Sancho-Izquierdo, M. 465, 613, 682
Sandberg, L. 226
Sandgren, K.O. 55, 256
San-Millán-Alonso, R. de 150, 161
Sánchez-Latour, C. de 493
Sánta, F. 215
Santamaria-Arnaiz, P. 339
Santelli, C. 325
Santillana, de 214
Santos-Dumont 278
Sanzio (Santi) R. 219
Sao, P. V.X. 502
Sapfo 196
Sapir, E. 29
Sar, S. 206
Sarafov, I. 199, 506, 663
Sárossi 63
Sarpy 206
Sartre, J.P. 184, 208, 323, 327, 328
Sasonov, D. 199
Sata 289
Šatow, E. 7, 27
Šaulys 224
Saunders, M. 193
Saussure, F. de 58, 64, 121
Saussure, H.B. de 273
Saussure, R. de 58, 72, 132, 140, 142, 166, 207, 254, 265, 273, 305, 665, 666
Saville, G. 195, 273
Saxl, M. 72
Sayers, J.D. 179, 244
Sazonova, H. 233
Schaff, A. 121
Schamanek, J. 450
Schattat, W. 290
Schauhuber, A. 149, 152
Scheerpeltz 209

Scheithauer 276
Scherer, J.R. 162, 341, 433
Scherer, K. 273
Scheurmann, E. 225
Schild, A. 276
Schiller, F. 128, 142, 209
Schleicher, I. 202, 255
Schleyer, J.M. 123, 124
Schlüter, K. 283
Schmid, J. 209, 265, 666
Schmid, W. 76
Schmidt, J. 256, 257
Schmidt, K.O. 74
Schmidt, R. 143
Schmitz, E. 468
Schmucker, A. 244
Schneeberger, F. 276
Schnitzler 209
Schoofs, F. 204
Schoor, J. van 119, 149, 165, 204, 207
Schoor, O. van 204
Schramm, A. 142, 276
Schreiner, O. 196
Schreuder 269
Schröder, J. 209, 449
Schuchardt, H. 422, 449
Schuck, F. 260
Schulhof, S. 134-136, 144, 199, 238, 240
Schutkowski, O. 288
Schwartz, A. 782
Schwartz, R. 58, 156, 160, 164, 165, 179, 181, 191, 656
Schweizer, K. 258
Schwerin, K. 210
Schwerin, P. 210
Schwier, W. 706
Scolnik, J. 269
Scott, H.M. 195, 286
Sčuka, V. 327
Seabra, M. de 229, 241
Sebert, H. 55, 140, 250, 251, 295, 305, 417, 420, 421, 424, 426, 431, 432, 461, 512, 667
Seemannová-Suchardová, E. 175, 200
Segantini, G. 277
Segrétinat 206
Ségur, de 256
Seidel, H. 209, 247
Seidl 209
Seifert, J. 200
Seipel, I. 678
Seippel, P. 207
Sekelj, A. 222, 331
Sekelj, T. vi, 178, 184, 188, 241-244, 273, 327, 448, 493, 504, 517
Sekido 268
Sekiguči n. 283
Seleznev, I. 132, 135, 231, 293
Selso, Diego (ps. de A. Hrynkiewicz)
Selzer, B. 275
Seneca 224
Senes, L. 217
Šenoa, A. 221
Sentis, H. 58, 135, 139
Sepamaa (v. Seppik)
Seppik (Sepamaa), H. 58, 203, 244, 479
Serrano, J. vi
Serao, M. 219
Sergeev, I.V. 500
Šerment, M. 325, 327
Serov, I. 732
Serre, J. 257
Servian, J.L. 269
Setälä, V. 58, 60, 70, 71, 91, 186, 203, 270, 460, 584, 666
Sevak, G. 683, 722
Séverac, J.B. 264
Severn, W. 193
Seynaeve, M. 204
Shakespeare, W. 31, 128, 146, 168, 184, 192-195, 322, 325, 328, 342, 406, 503, 685
Sharpe, R. (ps. Ro Šo) 141, 448
Shaw, B. 323
Shazar, Z. 382
Shibata yuji 382
Shinoda hideo 268, 269, 520
Shogi Effendi 259
Shorter-Eyck, J. 276
Sibelius 331
Siebarth, W. 747
Sienkiewicz 226, 228, 247
Sieroszewski, W. 152, 226, 247, 278
Siewierski 710
Sifo 489, 490, 638
Sigmund 230
Silfer, G. (ps.) 176, 183, 301
Silone, I. 217
Silva, A. da 208, 229, 271-273, 275, 277, 278
Silva, V. da 192
Simaki kensaku 219
Simeonov, A. 199
Simeonov, S. 199
Simon 275
Simondetti, M. 268
Simoni, C. 192, 278
Simonnet, F. 320
Šimunović, D. 221, 246
Sinclair, U. 195, 645, 781
Sinding 331
Sinha, L. 161, 179, 211, 272, 341, 484, 494
Sinpak 274
Sinnotte, A. 142
Sirk, H. 202, 262, 270, 671, 683, 684
Sirunjan, V. 197
Siwicki, K. 285
Skaer, K. 275
Skaftfell, B.B. 494
Skaljer-Race, V. 178
Skanderbeg 278, 506
Škatarić, A. 711, 713
Skeel-Gjørling, F. 202, 458
Skjerninge, E. 268
Škrljac, F. 222
Skrypnik, N.A. 728
Slavejkov, P. 197
Słonimski, A. 274
Slösser-Bresler, M. 60
Słowacki, J. 133, 226, 228, 322
Smedt, P. de v, 225
Smet, W.M.A. de vi, 269, 521
Smetana 151, 349
Smilov, N. 328
Smirnenski, Ĥ. 197, 199, 246
Smirnov, P.A. 272

Smit, A. 150
Smit, W. 301
Smith, N.R. 606, 614
Smogorzewski 274
Smoleń, K. 271
Smuul, J. 203
Snejko, D.S. 721, 731
Söderberg, K. 682, 683, 685
Sofoklo 184, 196
Sokrato 277
Sola, M. 176
Solis, F.X. 475
Solĵenicin, A. 331
Solomon, G.G. 70
Solovjev, M. 66, 135, 144, 293
Solsona 264
Solzbacher, W. 292, 583, 761
Somlai (Spierer), L. 213, 215, 330
Sommerfeld, A. 770
Song bong-ug 495
Soni, R.L. 259
Sonnabend, H. 91, 92, 102, 517
Sonnenfeld, E. vi, 214,
Sós, E. 274, 283 [273,486
Sosnovski, L. 263
Sotos-Ochando, B. de 123
Southcombe, H.W. 272
Spaak, P.H. 204, 322
Špicer, M. 137, 221, 237, 473
Spierer (v. Somlai)
Spiridoviĉ, E.F. 725-727, 731, 733, 747
Springer, G.P. 747
Sproeck, A. 185
Sredić, G. 178
Štádler, J. 200
St. Clair, R.W. 480
Stahlberg, W. 274
Stalin, J.V. xxii, 121, 240, 263, 278, 650, 653, 655, 663, 722-731, 733, 737-739, 741-745, 747
Stamatiadis, A. 464, 666
Stamatov, G. 197, 199, 246
Stampa, G. 219
Stancliff, F. 131
Staněk, J. 175
Stanišić, P. 271
Stankievič, V. 138
Staritsky, D. 233
Stark 276
Starke, A. 343
Starovasnik, E. 222
Starr, M. vi, 487, 658, 661, 782, 783
Steche, A. 700
Stefančić, J. 151, 221
Steiner, H. 55, 58, 167, 210, 279, 341, 450, 451, 678-680, 706
Steinhaus, J. 66
Stellih 263
Stephan, F. 209
Stephen, C. 258
Stettler, E. 277, 433, 436, 438, 445, 485, 612
Stevenson 195
Stewart 209
Stifter 210
Stillman, E.C. 149, 152
Stipriaan Luiscius, J.M. van 225, 248
Stojan, P.E. 55, 56, 58, 66, 68, 109, 167, 255, 279, 292, 310, 521, 670, 804
Stoll, M. (Greta) 178, 184
Stolle, R. 268
Stǿp-Bowitz, C. v, 58, 445, 479, 507, 512, 584, 668, 683, 684
Storm, B.C. 594
Storm, T. 210, 247
Streicher, O. 747
Strelczyk 278
Strindberg, A. 235, 685
Strindberg, N. 273
Stroele, G. 206
Ström, B. 235
Strong, J.V. 278
Strönne, J. vi, 277, 336, 341, 588
Strümpfel, M. 149, 152
Studd, P. 382
Stuit, S. 208
Sturmer, K.R.C. (ps. Kenelm Robinson) 160, 165, 193, 195
Sturzenegger, J.J. 276, 620
Stuttard, M. 179, 195, 278
Styler, A.E. 137, 141, 192
Su, A. 176, 301
Subhandro Bikŝuo 259
Subotić, N. 178
Sudano (ps) 278
Sudec, M. 76
Sullivan, J.H. 60, 74
Sumín, J. 200
Sun jatsen 274
Surotte 276
Susuki kaname 219
Sutkovoj, V.G. 151, 152
Suttner, B. von 209, 260, 530
Sutton, G.A. 223
Svadost, E. 501, 743
Svanbom, K. 135
Svane, E. 512, 782
Svjatenko, F. 233
Svobodová, R. 200
Swedenborg 258
Święcicki, H. 519
Świętochowski 136, 228
Swift, J. 192, 193
Świstak, S. 320, 329
Sygnarski, M. 747
Szabó, A. 180
Szabó-Felsö, F. 546
Szabolcska 214
Szapiro, J. 164
Szathmári, S. 119, 181, 182, 244, 301, 659
Szczypiorski, A. 229
Székely, J. 533
Székely-Lulofs, M.H. 225
Szerdahelyi, I. v, 70, 105, 467, 518
Szilágyi, F. 70, 72, 118, 119, 147, 152, 156, 158, 159, 171, 179, 188, 189, 215, 233, 235, 238, 240, 244, 275, 301, 315, 341, 484
Szmurlo, V. 138, 266
Śalom-Alefiem 128, 221, 247
Śan, K.Ĉ. 201
Śarapova, A. 142, 231,254, 256
Śatunovskij, S. 138
Śĉavinskij, T. 52, 142, 232

INDEKSO DE PERSONOJ

Ŝejnman, M. 256
Ŝevĉenko, T. 235
Ŝibajama kei 201, 259
Ŝidlovskaja, M. 231-233, 271, 300
Ŝidlovskij, K.I. 138
Ŝimomura joŝisi 60, 74, 219
Ŝirjaev, I.G. (ps.: Ivan Malfeliĉulo) 56, 109, 141, 293, 368, 410, 445, 670, 804
Ŝiŝmanov, I.D. 56
Ŝlat, J. 343
Ŝolohov, M. 233
Ŝpicer, M. (v. Špicer, M.)
Ŝumilov, P. 722
Ŝuzui hajime 219
Ŝvarc, T. 159, 179
Ŝvedova 233
Ŝvernik, N. 263, 650
Tabata kisaku 161, 165
Tabukaŝvili 222
Taĉibana kenji 155
Tada ryuji 254
Tadijanović, D. 221
Tadolini, L.L. 176
Tagore, R. 211, 254, 277, 494, 784
Taguĉi tacuo 268
Tagulo (ps. de Hyams)
Takač, Ž. 52, 184, 221
Takács, J. 309, 310
Takagi 285
Takahasi 268
Takase toyokiti 267
Takasugi iĉiro 663
Takata 286
Takeuĉi jiro 716, 747
Takeuĉi tookiĉi 279, 290
Tamura 268
Tanaka sadami 177, 220
Tanizaki zyun'itirô 220, 327
Tanuma-Tosio, J. 257
Tárkony (Totsche), L. 118, 119, 147, 152, 153, 168, 189, 208, 215, 240
Tasso, T. 219
Tauli, V. 121
Tejchfeld 286
Tekahionwake 216
Tell, L. 254, 267, 268
Tellini, A. 197, 216, 217, 255, 270
Tenner, M.S. 136, 231, 254
Tennyson 192
Tensen, J. 358
Texeira de Freitas, M.A. 506
Thalvest, M. 325, 329
Thant, U 12, 782, 784
Thébaud 693
Theobald, H. vi, 271, 747
Theotokopuli, Domeniko (ps.: El Greco) 277
Thèvenin, L.J. 175, 207
Thézard, J. 161
Thiébault, J. 260
Thierry, J. v, vi, 77, 617
Thijssen, T. 225
Thilander, H. 515
Thirring, H. 262, 270
Thomas, Ben Bowen 772
Thomas, Brandon 322
Thomas, J. 769
Thomas, L.L. 747
Thomsen, D. 165
Thomsen, H.T. 202, 225, 237
Thomson, A.W. 521
Thomson, J.J. 512
Thoraeus-Ekström, M. 182
Thorburn, A. 721
Thórdarson, T. 494
Thormodsen, O. 519
Thorsen, P. v, 52, 55, 173, 202, 203, 241, 301, 342
Thorsteinn frá Hamri 172, 216
Thorsteinsson, T. 494
Tiborc, S. 216
Tieck, L. 209
Tijunaitis 224
Tikos 507
Timkovskij 232
Timmermans, F. 204
Tišljar, Z. v, 334, 343
Tito (v. Broz-Tito)
Titov, G. 722
Titov, S. 722
To hoai 236 To huu 236
Toczyski, J. 616, 617
Todokoro sakutaro 269
Tokieda motojuki 272
Toller, E. 210
Tolstoj, A.K. 232
Tolstoj, A.N. 154, 233, 246
Tolstoj, L.N. 126, 136, 231, 233, 244, 246, 254, 256, 260, 264, 277, 320, 414, 416, 499, 645, 684, 698, 699
Tomita tomu 177
Tommaseo, N. 219
Tomonaga sin'itirô 266
Tomov, A. 258
Tonkin, H. 58, 320, 331, 455, 538, 539, 541, 546, 547, 616, 685, 804
Tooguu tojosato 219
Tordoff, G.B. 195
Török, G. 58, 215
Torres de Quevedo 756, 757
Tortel 344
Tóth, V. 270
Totsche (v. Tárkony)
Tousseul, J. 207
Trajanova, M. 328
Trajkov, G. 382
Tram dan tien 278
Tran dinh van 278
Tran do 236, 271
Tran van can 276
Trarbach, P. 290
Trésorier 693
Trinité 144
Triolle, R. 546
Trobisch, W. 255
Trockij, L.D. 728
Trögel, R. 747
Trompeter, W.H. 66, 277, 293, 462
Trudić, B. 184
Truong chinh 278
Tucker, A.G. vi
Tucker, G. 195
Tugan-Baranovskij 271
Tuglas, F. 203
Tuinder, J.A. 257, 525
Tulve, H. 203
Tumenggung, D. 505
Turek, A. 271
Turgenev, I. 142, 231, 232, 246

Turković, Š. 711, 713
Turner, F. 283
Turone, G. 327
Tuwim, J. 229
Tvarožek, E. V. 185, 200
Twain, M. 195
Tymiński 482
Ueyama masao 177, 181, 183, 220
Uhlmann, F. 260, 291
Uitterdijk, D. 477
Ujlaky-Nagy, T. 291
Ukrainka, L. 235
Ulfers, S. 224, 225
Umeda jošimi vi, 328, 341, 540
Under, M. 203, 248
Ungár, I. 330
Ungaretti 219
Unger, H. vi, 272, 356, 361, 524, 709
Unterman, R. 143
Urban, E. 286
Urban, Š. 52, 63, 174, 180
Urbanová, E. 174
Ursinus 257
Usinger, P. 208
Uśpieński, J. 329, 617, 618
Vaarandi 203
Vahen-Svetinov, D. 151, 719
Vaillant, G. 206, 271
Väisälä, Y. 339, 513, 682
Valentinov 489
Vallarta 769, 772
Vallienne, H. 139, 206, 223, 242, 255, 300
Vallienne, s-ino 143, 144
Vámbéry, R. 270
Váňa, V. 182, 200, 276
Vanbreuse 94
Vančik, B. 52, 178, 222
Vandermeulen 94
Vang šifu 201
Vanselow, K. 149, 152
Vapcarov, N. 199
Varankin 50, 56, 119, 163, 650, 731
Vares-Barbarus, J. 203, 732
Vargas, A. 496
Vatré, H. vi, 119, 150, 168, 208, 301
Vavrovský, J. 270
Vaz-Ferreira, C. 254
Vazov, I. 197, 199, 246, 323
Veenendaal, van 535
Velázquez 277
Velde, A. van de 225
Velebit, J. 177, 221, 222, 301
Velten, W. 142, 206, 288
Vendroux, J. 780
Ventura-i-Freixas, J. 223
Venture, A. 290, 315
Verax, C. (ps.: Verks) 140, 250, 266, 283, 286, 291, 292, 305, 665
Verda, M. 288
Verda, V. 288
Verdiro (ps.) 264
Verga, G. 217, 219
Vergnaud 262
Verks (ps. de Verax)
Verloren van Themaat, W. A. 121
Vermaas, M. vi, 76, 589, 594, 619, 685, 686, 782, 783, 791
Vermandere, R. 204
Vermuyten, H. 142, 204, 238
Veronese, V. 768
Vigny, de 207
Vilborg, E. 58, 308, 668
Vildrac, C. 184, 208
Villanueva 666
Villareal, F. 266
Vinař, V. 60, 74, 200
Virgilo (Vergilius) 223
Vives, J.L. 5
Vivian, C. 267
Vladyka, L. 200
Vo nguyen giap 264, 271
Vogelmann, B. 358, 687, 690
Vogt, A. 438
Volquemar, M. 693
Voltaire 164, 207, 208, 645, 656
Vondel, J. van den 225
Vondroušek, J. 200
Vörös, C. 265
Vossler, K. 702, 747
Vrančić, J. 330
Vrchlický, J. 199
Waagenaar, S. 275
Wackrill, A.E. 128, 142, 192, 193, 666
Wadham 193
Wagnalls, M. 193
Wagner, C. 255
Wagner, H. 271, 747
Wagner, R. 277
Waher, W. 133
Wahl, E. de 47, 66, 132, 230
Wajsblum, M. 56, 258, 533
Wallon 276
Wannemakers, H.G. 290
Wappers, C. 182
Warden, J.M. 665, 666
Waringhien, G. vi, 55-58, 70-73, 121, 125, 126, 128, 131, 150, 166, 186, 189, 205, 207, 208, 210, 217, 226, 281, 283, 301, 315, 327, 330, 331, 417, 427, 440, 445, 446, 461, 654, 656, 659, 663, 666, 668, 669, 674, 684, 685, 689, 803, 804
Waśkiewicz, K. 329
Waśniewski, J. 138, 293, 481
Wates, G.F. 260, 271
Weber, G. 450, 679, 706
Wegener, L. 269
Weide, A. 226
Weide, E. 226
Weide, Eliza 327
Weinhengst, A. 163
Weinstein, A. 228
Weissberg, A. 730, 732, 747
Weleminsky, J. 193
Wells, H.G. 193
Wells, J.C. 58, 73, 76, 274, 320, 523, 539, 618, 683
Wels, B. 278
Welsch, M. 337
Welzl, J. 200, 246, 273
Wensing, E.L.M. 616, 686-688, 690
Werner, F.C. 292
Werner, P. 663

Werner, V. 200
Wesian, J. 87
Wessel, M.J. 225
Westcott, M. 192
Whitman 254, 277
Whorf, B.L. 121
Wicke, F. 209
Więcko, W. 229
Wieczorek, K. 270
Wiener, L. 211
Wiesenfeld, E. 135, 151
Wijk, van 273, 275
Wilde, O. 193
William, P. 256, 268
Williams, N. v, 506
Wilson, A. 193
Wilson, H. 521
Wilson, T.W. 274
Wincelberg, S. 324, 326, 329
Windeballe, E. 202
Winkler, V. 74, 222
Winsch, W. 256, 268
Wirkberg, J. 288
Wiseman 193
Wisnovszky 273
Włodarczyk, W. 174
Wodehouse, P.G. 195
Woessink, E.J. 594, 616, 618, 686
Wohlthat, A.E. 210
Wójcik 276
Wolff, H. 210
Wolski, J. 228
Wong Kenn 490, 491
Woodburn, A. 15
Woodruff, E.W. 483
Wright, H.M. 291
Wright, P.A.G. 60
Wüster, E. 58, 72, 166, 209, 210, 217, 266, 282, 283, 285, 291, 292, 722
Wybenga, P. 208
Wyslouch 228
Wyspiański 136, 228
Xavier, F.C. 229, 260
Yagi hideo 269, 327, 614-616, 683, 684
Yamada tempu 177
Yamaguti senzi 246, 262
Yamane 267
Yanagita kunio 241
Yardley 278
Yelland, E.E. 195, 291
Yersin 206
Yoxon, G.H. 211, 259
Zabillon-d'Her, J.R. (ps.: Evidino) 52, 140, 257, 295
Zacho, P. 255
Zahariev, Z. 260
Zahn, E. 209
Zakrzewski, A. 55, 142, 445
Zaleski-Zamenhof, L. vi, 709
Zalewski 276
Zamacoïs, M. 207
Zamenhof, Adam 709
Zamenhof, Felix (Felikso; ps. FeZ) 132-135, 678, 806
Zamenhof, Leono 136, 228
Zamenhof, Lidja 228, 258, 259, 279, 438, 709
Zamenhof, Ludoviko Lazaro x, 26, 35-38, 41, 42, 46-48, 53, 55, 59, 61, 62, 65, 66, 72, 73, 109, 119, 124-132, 135, 136, 144, 167, 186, 190, 192, 202, 206, 208-211, 213, 221, 226, 227, 231, 237, 240, 241, 244, 250, 255, 256, 274, 277, 293, 298, 317, 319, 343, 369, 370, 372-374, 383, 397, 398, 410, 413-415, 417, 418, 420, 422-430, 439, 442, 445, 448, 449, 454, 456, 462, 468, 483, 486, 487, 497, 499, 516, 530, 555, 578, 579, 600, 606, 612, 620, 626, 636, 639, 641, 656, 664, 675, 697, 700, 703, 708, 718, 743, 776, 800, 804
Zamenhof, Marko 125
Zamenhof, Wanda 709
Zamenhof, Zofia 709
Zamjatin, V. 232
Zanoni (ps. de Pillath)
Zápotocký, A. 741
Zavala-Muniz, J. 772
Zawada, J. v, 481
Zay, J. 461
Zee, Saint-J. 152, 201, 241
Zeidtlitz, O.W. 138, 235, 293
Zetel 228
Ziegler, Siegfried 50, 269
Ziegler, Sven 616
Ziková 200
Zilahy, L. 215
Zinovjev 649
Ziółkowska, M. 247, 277, 446
Živanović, S. 152, 161
Zlatnar, P. 60, 73, 86, 109, 616, 617
Zodel, S. 180
Zola, E. 277
Zon, W. van 228, 257
Zorović, B. (ps. de Brozović)
Zorrilla, J. 214
Zschokke 210
Żuławski 228
Župan, M. 325
Zwach 209
Zweig, S. 210

INDEKSO DE TEMOJ

Mallongigoj en la Indekso de Temoj

ag.: agado
E.: Esperanto, esperanta
eld.: eldona agado
ĝen.: ĝenerale
instr.: instruado
k.: kaj
Kn.: Kongresoj (ne UK), Konferencoj, kunvenoj
k.s.: kaj sekvantaj paĝoj
kult.: kultura agado
lit.: literatura agado, literaturo
mov.: movado
ne E.: neesperanta
orig.: originala
P.: periodo
persek.: persekutoj, malpermesoj
PTT: Poŝto-Telegrafo-Telefono
R.: Radio
trad.: traduka, tradukita, tradukoj
UK: Universala(j) Kongreso(j)

Adresaro de Esperantistoj 66, 127, 310, 449, 499
afekcia karaktero - de dialekto 45, de E. 46
afiksoj 36, 40, 42, 43
Afriko 338, 401, 488, 503, 546, 620, 743
  Norda 4, 31, 40, 116, 397
  Suda 97, 195, 298, 483, 503
aglutina karaktero 38, 40, 65, 756
Akademia Esperanto-Klubo 84, 85, 474, 713
Akademio de Esperanto xxvi, xxviii, 43, 53, 54, 72, 252, 281, 295, 386, 603, 664, 686, 797
aktoroj 321-326. v. ankaŭ teatro
Albanio 505, 506, 754
Alĝerio 253, 503
Amerika Filozofia Societo 127, 414, 486
Ameriko 5, 29, 87; Latina 63, 448, 505, 546; Norda 29, 331
Amsterdam 48, 107, 325, 478, 509, 648, 650, 655
Anglio 6, 7, 300, 320. v. ankaŭ Britio
Angolo 503
antisemitismo 714. v. ankaŭ Judoj, persekutoj
Antologioj 236 k.s.; Angla 169, 171, 196, 241, 626; Aŭstria 211, 240; Belga 204, 207, 238, 452; Brazilaj Rakontoj 229, 240; Bulgara 199, 238; Ĉeĥoslovaka 200, 240, 246; Ĉina 201; Dana 202, 241, 459; El Parnaso de Popoloj 133, 196, 217, 224, 237; Esperanta (poezia) 169, 175, 188; Estona 203, 240; Eterna Bukedo 146, 196, 197, 207, 210, 215, 217, 219, 224, 229, 238; Hungara 146, 147, 159, 215, 240; Kataluna 223, 238; Pola 228, 237; Portugalaj Rakontoj 229, 241; Sveda 233, 240; Svisa 207, 210, 217, 230, 240, 485
Antwerpen 395, 453, 650; UK 322, 374, 391, 426, 453, 526
Argentino 81, 89, 101, 102, 175, 448
arkaismo 45, 127. v. ankaŭ evoluo de E.
arto (literaturo pri) 275
aspektoj de la lingva problemo - ekonomia 20; jura-politika 19; psikologia 19; socia 16; teknike-lingva 15
Aŭstralio 29, 87, 92, 93, 101, 102, 332, 449
Aŭstrio 70, 82, 90, 91, 93, 99, 101, 102, 104, 209, 302, 320, 363, 364, 367, 395, 439, 447, 449 k.s., 506, 648, 652, 653
Azio 4, 29, 32, 40, 87, 116, 338, 401, 472, 502, 504, 546, 620, 627, 743
bahaismo 258, 259, 279, 472
Barcelona 357; UK 314, 322, 391, 424, 465, 509
Baza Laborplano, Baza Laborprogramo v. Planoj kaj Programoj de UEA
Belartaj Konkursoj v, 52, 53, 175, 177, 178, 184, 202, 314 k.s., 326, 327, 329, 330, 343, 344, 380, 496, 557, 581, 608, 619, 622, 623
beletro originala 115 k.s., 242, 645, 754. v. ankaŭ literaturo
beletro traduka 47, 190 k.s., 645. v. ankaŭ literaturo
Belgio 51, 91, 92, 94, 98, 102, 122, 260,

323, 341, 363, 395, 407, 452, 623, 650, 754
Beograd 297, 332, 335; Kn. 87, 402, 475, 656; R. 82, 351; UK 315, 319, 362, 382, 386, 390, 392, 682
Berlin 48, 367, 462, 492, 493, 650
Bermudo 101, 102
Bern UK 322, 376, 391, 428, 442, 443, 485, 548, 559, 712; R. 349-351, 399
Białystok 36, 125, 127, 606
Biblio 211, 213, 256, 305, 514, 533; Malnova Testamento 128, 130, 211, 213, 256; Nova Testamento 196, 256, 257
bibliografio (scienco) 54, 55, 58, 308, 668, 673
Bibliografio (en tiu ĉi verko) 27, 44, 64, 109, 121, 188, 248, 279, 292, 310, 343, 368, 410, 444, 506, 533, 547, 634, 661, 669, 693, 746, 791, 803
Bibliografio de Internacia Lingvo (Stojan) 55, 68, 109, 167, 279, 309, 670, 804
bibliotekoj 34, 51, 55, 447, 449, 486, 491, 672, 679, 680; de UEA xxix, 439, 595, 619, 680
biografioj 277 k.s.
Bjalistoko v. Białystok
blinduloj 514, 754
Bologna 357; UK 322, 385, 391, 470, 586, 589, 593, 596, 599, 602
Boulogne-sur-Mer UK 130, 322, 346, 373-375, 382, 387, 390, 417, 418, 420, 510, 534, 664, 699
Bournemouth UK 314, 317, 391, 455, 623, 682, 735
Brazilo 51, 82, 89, 90, 94, 99, 102, 152, 173, 240, 253, 260, 351, 363, 364, 395, 399, 436, 453, 506, 754
Brita Esperantista Asocio 332, 454, 483, 506, 593, 678, 680
Britio - eld. 50; instr. 82, 90, 92, 94, 98, 99, 101, 103, 104, 754; kult. 315, 335, 341, 399; mov. 394, 395, 440, 442, 447, 454, 506, 588, 593, 623, 650, 659; ne E. 7, 8, 122. v. ankaŭ Anglio
Brussel 295, 359; eld. 51; Kn. 645; UK 318, 319, 385, 391, 453, 614, 626
Budapest 105, 106, 293, 356, 357, 362; eld. k. lit. v. Budapeŝta Skolo, Literatura Mondo; Kn. 395, 517; R. 350, 738; UK 165, 323-326, 329, 332, 334, 386, 391, 392, 433, 466, 467, 498, 627, 701
Budapeŝta Skolo 48, 50, 120, 121, 132, 144, 148, 149, 151, 152, 154-157, 160, 162, 167, 168, 171, 173, 179, 213, 238, 300, 330, 466. v. ankaŭ Skoloj literaturaj
budhismo 32, 259, 279, 531
Bulgara Esperanto-Teatro 321-323, 325, 326, 328, 329, 457. v. ankaŭ teatro
Bulgario 70, 89-92, 94, 99, 103, 104, 115, 257, 293, 333, 335, 351, 361, 363, 364, 395, 447, 456, 506, 545, 650, 652, 707, 739, 741, 754
Bulonja Deklaracio v. Deklaracio pri Esperantismo
Bulonjo v. Boulogne-sur-Mer
Cambridge UK 322, 374, 390, 427, 455
Ceilono 101, 102, 504
Centra Oficejo (Sebert) 54, 295, 420, 424, 428, 431, 432, 461, 667
Centra Oficejo (UEA) - administra vi, 378, 404, 528, 542, 545, 585, 586, 589, 603, 619, 623, 686; direktoro 347, 379, 575, 576, 583, 590, 618, 685; informoj 349, 354; Genève 349, 354, 365, 366, 430, 440, 485, 630; London 439; Rotterdam xxix, xxxi, 478, 505, 565, 594, 595, 602, 604, 620, 622, 628, 672, 677, 782, 784, 800. v. ankaŭ Universala E-Asocio
Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) - ĝen. vi, xxv-xxvii, xxix-xxxi, 87, 581, 596-599, 620, 622, 623, 628, 669 k.s.; aŭspicie 57, 73; dokumentoj k. eld. 61, 242, 310, 339, 607, 619, 624, 626, 627, 673, 746, 779, 784, 790 (cite en Bibliografio 27, 64, 109, 121, 248, 279, 292, 344, 368, 410, 533, 634, 792, 803, 804; pri ag. UEA 404, 407, 719; pri E. 56, 308, 597-599, 606, 785; pri instr. 60, 86, 88, 93, 102, 407, 622; pri lit. 186; pri PTT 364); enketoj k. esploroj 81, 85, 88, 89, 93, 99, 102, 103, 350, 395, 396, 399, 400, 408, 517, 561, 609, 745, 786; informado 20, 27, 68, 82, 98, 358, 360, 387, 402, 407, 486, 549, 596, 765, 767, 768; kult. 53
Cseh-metodo 78, 79, 498, 504; kursoj 435, 494, 504. v. ankaŭ instru-metodoj, Internacia Ĉe-Instituto
Ĉeĥoslovakio - eld. 302, 364; ĝen. 659; instr. 83, 91, 92, 94, 99, 101, 103, 106, 754; lit. 151, 200, 240; kult. 316, 322, 335; mov. 367, 395, 433, 439, 457, 509, 610, 627, 648, 650, 656, 736, 744; persek. 720, 735, 739-741; R. 349

Ĉina Esperanto-Ligo 50, 492, 736
Ĉinio 12, 50, 63, 81, 101, 102, 245, 264, 304, 332, 361, 489, 490, 650, 652, 714, 736, 739, 754
Danlando 50, 82, 91, 92, 99, 101, 103, 184, 253, 268, 332, 335, 395, 458, 659
Danzig 436; UK 391, 678
Deklaracio pri Esperantismo (Bulonja Deklaracio) 387, 388, 417, 418, 420, 425, 636, 657
Deklaracioj (dum UK) 387, 388, 665; de Tyresö 542, 544
Delegacio por alpreno de lingvo internacia 422, 423, 444
Delegitoj de UEA 346 k.s., 354, 357, 365, 386, 425, 439, 440, 490, 511, 512, 514, 557, 558, 575, 576, 596, 599, 612, 620, 622, 632, 669. v. ankaŭ Servoj
denaskaj esperantistoj 59, 74
derivado 40, 43, 756
dialektoj 3, 4, 30, 41-43, 45, 46
diferencigaj faktoroj v. faktoroj
diskoj 62, 67, 76, 77, 80
dramo - ĝen. 120, 322, 482; orig. 47, 143, 144, 161, 165, 168, 184, 321, 330; trad. 47, 184, 192, 193, 199, 201, 203, 209-212, 215, 216, 219, 221-223, 225, 226, 228, 230, 231, 233, 235, 323, 324, 326-329, 331. v. ankaŭ teatro
Dresden 367; UK 322, 374, 390, 425, 462, 636, 665
Edinburgh Kn. 545, 546; UK 391, 455
egaleco (inter homoj, lingvoj, ŝtatoj) 8, 10, 11, 20, 33, 398, 402
Egiptio 341, 503
ekonomia aspekto v. aspektoj de la lingva problemo
ekonomiaj-sociaj faktoroj v. faktoroj
EKRELO 48, 232, 493, 648, 650
ekspozicioj 358, 487, 608. v. ankaŭ Universala Ekspozicio de E.
ekzamenoj 73, 87, 94, 140, 189, 355, 445, 450, 452, 455, 465, 467, 468, 470, 478, 479, 484, 803. v. ankaŭ Internacia Diplomo, Internacia Ekzamena Komis.
Ekzercaro 66, 127, 128, 468
Eldona Fako de UEA 50, 67, 109, 295, 310, 397, 504, 596, 603, 619, 624
Eldona Societo Esperanto 50, 51, 483, 484
eldonejoj 48 k.s., 459, 462, 463, 473, 499, 503
Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo v. EKRELO
Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj (Lapenna) 62, 73, 188, 383, 445, 634, 803
El Parnaso de Popoloj v. Antologioj
elvokiveco (lingva) 46, 114
Enciklopedio de Esperanto 56, 57, 82, 109, 355, 368, 410, 445, 670, 803; 2-a eld. en preparo xxix, xxx, 677, 680
eseo 73, 129, 130, 144, 147, 155, 166, 168, 173, 176, 177, 180, 183, 186, 189. v. ankaŭ beletro, literaturo, prozo
Esperantaj Francaj Eldonoj 50, 60, 66
Esperantista Interhelpo 367, 440
Esperantista Laboristo (Le Travailleur Espérantiste) 265, 302, 461, 637, 640
Espérantiste, L' 52, 132, 237, 295, 297, 416
Esperantisto, La 48, 127, 128, 130, 132, 190, 192, 211, 293, 294, 415, 416, 446, 462, 481, 483, 499, 698
Esperanto - deveno 36; ekesto 35; evoluo 42 k.s.; instr. 65 k.s.; karakterizoj 38, 40-44; kult. k. aplikoj 45 k.s.; solvo de la mondlingva problemo xxvi, xxxi, 15, 26, 28, 29, 33 k.s.
Esperanto (revuo de UEA) - ĝen. 87, 294, 295, 301, 310, 401, 440, 442, 503, 577, 611, 619, 621, 622, 624, 628, 637, 685, 804; informoj 356, 387, 397, 400, 404, 406, 446, 571, 587-591, 596, 597, 599, 603, 607-609, 612, 616-618, 634, 662, 669, 672, 745, 749, 778, 779, 791; junuloj 538; lit. 172, 176, 186, 219, 260, 316; politika sinteno 438, 746, 747
Esperanto-Asocio de Norda Ameriko (EANA) 304, 487, 582-584, 719
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA) 298, 487, 719
esperantologio 46, 47, 54-56, 73, 138, 140, 142, 146, 166, 167, 177, 188, 254, 271, 308, 488, 645, 725, 803. v. ankaŭ filologio, interlingvistiko, lingvistiko
Esperanto Triumfonta 295, 356. v. ankaŭ Heroldo de Esperanto
Estonio 90; SSR 97, 500, 501, 732
Estraro de UEA - ag. 377, 399, 401, 403, 404, 549, 553, 565, 577, 592, 598, 603, 612, 631, 633, 634, 655, 742, 789; decidoj 86, 93, 314, 317, 347, 378, 439, 440, 545, 574, 585, 587, 589, 599, 606, 657, 681, 682, 686; elektiĝo 438, 576, 583, 591, 597, 613, 614, 616; informoj

k. raportoj 400, 774, 792; kompetento 379, 582, 618, 619, 685, 688, 690, 691; konsisto 617; kunsidoj 381, 383, 386, 585, 586, 590, 592, 593, 601, 670; kult. 314, 315, 319. v. ankaŭ Komitato de UEA, Universala Esperanto-Asocio
Eterna Bukedo v. Antologioj
etimologio 58, 73, 285
Eŭropo 4, 7, 30, 87, 341, 395, 505, 545, 546, 620, 623
evoluo - de E. 34, 42 k.s., 53, 54, 127, 796; de lingvo ĝen. 28, 32, 34, 35; historia, socia 20, 29, 33, 41, 46
facileco (de E.) 40, 43, 89
Fakaj Asocioj (FA) vi, 47, 64, 399, 462, 508 k.s., 558, 568, 576, 577, 596, 597, 599, 603-605, 609-611, 613, 622, 632
faka literaturo 249 k.s., 754. v. ankaŭ terminaroj fakaj
fakaj organizaĵoj 63, 64, 404, 406, 536, 557, 604, 778. v. ankaŭ Organizaĵoj Esperantaj
fakaj terminaroj v. terminaroj fakaj
faktoroj influantaj la lingvo-evoluon 28, 59; diferencigaj 29 k.s., 34, 35; ekonomiaj-sociaj 30, 32, 115, 116; geografiaj 29; klerigaj 32-34; religia 32; seksa 31, 32; teknikaj 32, 33; unuecigaj 29, 32 k.s., 115. v. ankaŭ evoluo
faŝismo 84, 436, 437, 443, 450, 463, 466, 469, 509, 648, 650, 652-655, 702, 703, 707, 711, 713, 717, 718, 734, 745
feriejoj 61, 82, 475. v. ankaŭ turismo
fervojistoj 285, 304, 306, 480. v. ankaŭ Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
feŭdismo 4, 5, 30, 31, 35, 124
filatelo 276, 282, 286, 516. v. poŝtmarkoj
Filipinoj 505
filmoj 34, 62, 314, 326, 327, 330 k.s., 335, 341, 387, 459, 479, 480, 506
filologio 73, 166, 286, 527. v. ankaŭ esperantologio, interlingvistiko, lingvistiko
filozofio 254, 282, 286, 682
Finnlando 51, 54, 82, 91, 95, 99, 101, 103, 106, 126, 253, 341, 395, 459, 506, 754
Flandra Ligo Esperantista (FLE) 452, 706
FLE v. Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj "Fidu la Estontecon"
fleksebleco (de E.) 38, 43, 127, 191
Floraj Ludoj 52, 141, 150, 151, 314
foiroj 356
fondo kaj historio de UEA 55, 140, 346, 365, 424 k.s., 485, 534, 556, 579, 590, 626, 629, 685. v. ankaŭ Universala Esperanto-Asocio
fonetiko 38, 40, 58, 73, 76, 88, 105
For la Neŭtralismon! (Lanti) 265, 641, 662
Formozo v. Tajvano
Franca Akademio de Sciencoj 250, 251, 461
Franca Esperantista Kooperativo v. Grésillon
Franca Esperanto-Instituto 96, 477
Francio - eld. 50, 253, 260, 302; instr. 77, 81, 82, 92, 95, 99, 101, 103, 106, 754; kult. 315, 316, 338, 341; mov. 207, 394, 395, 416, 447, 460, 623, 650; ne E. 7-9, 122, 749; PTT 364
Frostavallen 336, 484, 599, 604, 605, 608, 624, 629, 677; Principaro 608, 622, 624
Fundamenta Krestomatio 72, 128, 130, 132, 135, 137, 144, 196, 237, 293, 388, 718
Fundamento de Esperanto 54, 66, 72, 77, 109, 128, 281, 665, 803
Gazetara Servo 380; Internacia (IGS) 581, 602, 622, 766; Kongresa (KGS) 387, 581, 599, 622, 623
gazetaro v, 46, 82, 139, 163, 202, 222, 293 k.s., 304, 306, 310, 342, 397, 399, 416, 601, 602, 624. v. ankaŭ periodaĵoj
gazetartikoloj 131, 135, 138, 140, 142, 164, 166, 167, 178, 186, 188, 397, 399-401, 403, 406, 557, 598, 622, 624, 640, 644
Genève 295, 365, 366, 432, 433, 439, 442, 574, 630; eld. 310; Kn. 84, 752; mov. 85; R. 349; UK 250, 302, 321, 322, 346, 369, 370, 374, 390, 391, 418, 420, 427, 485, 510, 512, 664, 681
genocido v. kultura genocido
geografia faktoro v. faktoroj
geografio (faka lit., periodaĵoj, terminaroj pri) 273, 282, 286, 305, 516
Germana Demokratia Respubliko 101, 298, 320, 361, 492, 545, 723, 734
Germana Esperanto-Asocio 462-464, 506, 653, 700, 703-705, 707, 708
Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA) 493, 507, 640, 648, 703, 707
Germanio - eld. 51, 209, 253, 295, 300, 302, 364; ĝen. 6, 122; instr. 82, 84, 91, 99, 713, 754; lit. 154, 155; mov. 367,

394, 399, 509, 627, 650; persek. 84, 437-439, 652, 653, 699, 702, 703, 706, 707, 709, 718, 731, 734, 739, 740. v. ankaŭ Germana Demokratia Respubliko, Germanio FR
Germanio, Federacia Respubliko 50, 92, 95, 101, 103, 106, 298, 304, 308, 395, 402, 462 k.s., 495, 545
gestoj (kiel esprimiloj) 3, 114
Göteborg 332, 483, 484, 646, 658
Gotenburga Konvencio 648, 659. v. ankaŭ Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)
Grajnoj en Vento 59, 75, 76, 86, 87, 518. v. ankaŭ infanoj, lernejoj
gramatiko 38, 40, 43, 58, 66, 67, 73, 77, 79, 81, 668
Graz 82, 87, 449, 452, 545
Greklando 99, 101, 395, 464
Grésillon (Kulturdomo) 53, 82, 301, 338, 340, 394, 395, 461, 691
Gronlando 101-103
grupoj lokaj v. Societoj
Gvatemalo 493
Ĝenerala Asembleo de UN v. Unuiĝintaj Nacioj
Ĝenerala Regularo de UEA v. Regularoj de UEA
Ĝeneralaj Kulturaj Aranĝoj 340, 386
Ĝenevo v. Genève
Haag, Den 53, 79, 82, 295, 478; UK 76, 323, 325, 386, 389, 391, 404, 407, 431, 607, 616, 630, 778, 779
Haarlem UK 319, 376, 385, 391, 392, 478, 580, 586-588, 593, 766, 767
Hachette 48, 128, 250, 298, 305, 310, 417, 418, 420, 421, 431, 453, 460
Hago v. Haag, Den
Hamburg 106; Kn. 84, 337; UK 319, 392
Hamleto 47, 128, 168, 192, 195, 322
Harrogate UK 323, 326, 386, 391, 455, 626, 677, 722
Helsinki 106; Kn. 91; mov. 82; R. 349; UK 319, 325, 344, 376, 385, 386, 389-392, 431, 434, 460, 578
Heroldo de Esperanto 135, 149, 151, 152, 166, 174, 186, 295, 309, 437, 440, 446, 478; eld. 48, 51, 463. v. ankaŭ Esperanto Triumfonta
Hilelismo 427
Himno 383, 421, 424, 443. v. ankaŭ kantoj, muziko
Hinda Unio 30, 95, 101-103, 264, 320, 335, 470, 493, 626
Hispanio 50, 82, 89, 95, 101, 103, 104, 106, 123, 175, 297, 298, 316, 367, 396, 399, 407, 447, 465, 506, 652, 710
historio de E. 52, 55, 411, 444, 445, 656, 798, 803. v. ankaŭ fondo kaj historio de UEA
Homaj Rajtoj v. Jaro de Homaj Rajtoj, Konferencoj, Universala Deklaracio
Homaranismo 124, 130, 427, 428, 641, 715
Honora Membro, Patrono, Prezidanto v. resp. Membroj, Patronoj, Prezidantoj
Honora Patrona Komitato de UEA v. Patronoj
humanismo 120, 160, 170, 171, 365
humuro 193, 195, 214, 228. v. ankaŭ satiro
Hungara Ŝtata Pupteatro 334. v. ankaŭ pupteatro
Hungario - eld. 51, 293, 302, 364; instr. 70, 89-92, 95, 101, 103, 106, 754; kult. 331, 334, 335, 337; lit. 159, 173, 215, 238; mov. 395, 396, 399, 447, 466, 507, 627, 648, 744; persek. 652, 653, 738, 739
idiotismoj 43, 46. v. ankaŭ evoluo de E.
Ido 130, 138, 421-424, 452, 459, 483, 636, 649, 664
Individuaj Membroj de UEA v. Membroj de UEA
Indonezio 4, 505
Infanaj Kongresetoj 60, 383, 656
infanoj 69, 70, 74-76, 87, 88, 97, 287, 306; porinfana literaturo 47, 60, 74, 87, 139, 193, 200, 217, 229. v. ankaŭ Grajnoj en Vento, Infanaj Kongresetoj, lernejoj, literaturo
informado 566, 569, 599
Informa Fako de UEA 581, 604, 619, 622, 623, 766; Informa Servo (bulteno) 622, 628
Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI) 358, 620, 622, 627, 687. v. ankaŭ komerco
Institucio Hodler 685
instruado 59, 65 k.s., 389, 467, 566, 569, 622, 729, 735, 752-754, 758, 777, 784, 798, 803. v. ankaŭ instruistoj, instrumetodoj, kursoj, lernejoj, universitatoj
instruistoj 59, 67, 72, 77-79, 81, 83, 87-89, 96-99, 103. v. ankaŭ Internacia Ligo

de Esperantistaj Instruistoj, Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj
instrumetodoj 26, 53, 77 k.s., 81, 464, 498. v. ankaŭ Cseh-metodo, kursoj
Interkonsento de Kolonjo 376, 438, 558, 573. v. ankaŭ Organizo de la E-Movado, Universala Esperanto-Asocio
interlingvistiko 55, 56, 58, 73, 121, 131, 166, 167, 188, 478, 488, 501, 803. v. esperantologio, filologio, lingvistiko
Internacia Arta Teatro (IAT) 165, 184, 322, 323, 325, 327-330, 622, 626. v. ankaŭ Internaciaj Artaj Festivaloj, teatro
Internacia Centra Komitato (ICK) 67, 376, 432-435, 446, 491, 667. v. ankaŭ Organizo de la E-Movado
Internacia Ĉe-Instituto 79, 295, 478. v. ankaŭ Cseh-metodo
Internacia Diplomo 602, 626. v. ankaŭ Internacia Ekzamena Komisiono (IEK)
Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) 73, 581, 608, 619, 622, 626. v. ankaŭ Internacia Diplomo
Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj vi, 64, 402, 510, 611. v. ankaŭ juro
Internacia Esperanto-Instituto 50, 53, 706. v. ankaŭ Cseh-metodo, Internacia Ĉe-Inst.
Internacia Esperanto-Ligo (IEL) 295, 310, 357, 368, 439-442, 446, 474, 485, 548, 549, 552, 558, 574, 591, 630, 634, 652, 667, 711, 712; Esperanto Internacia (revuo) 438, 440, 446; membronombro 440, 442. v. ankaŭ Organizo de la E-Movado
Internacia Esperanto-Muzeo (IEMW) vi, xxix, 55, 156, 167, 279, 308, 439, 450, 451, 676, 678 k.s., 706. v. bibliotekoj
Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) v, 51, 56, 64, 306, 325, 394, 395, 509, 611, 661. v. ankaŭ fervojistoj
Internacia Gazetara Servo v. Gazetara Servo
Internacia Jaro de Edukado (IJE) 88, 389, 397, 601, 608, 628
Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) vi, 51, 308, 310, 394, 458, 525, 526. v. ankaŭ katolikoj
Internacia Kortumo 10, 20, 398, 512
Internacia Labor-Organizaĵo 13, 397, 782
Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) 70, 76, 85-87, 90-93, 102, 517, 603, 608, 622, 672. v. ankaŭ instruistoj, Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj
Internacia Ligo por Esperanto en Poŝtoj, Telekomunikoj kaj Transportoj (ILEPTT) 364. v. ankaŭ Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio
Internacia Lingvo, La v. Esperanto
Internacia Lingvo, La (Lapenna) xxvi, xxvii, 53, 56, 343, 368, 599, 634, 675, 803
Internacia Organiza Komitato (IOK) por Zamenhof-Jaro 606
Internacia Patrona Komitato (por Zamenhof-Jaro) 465, 606, 626, 776. v. ankaŭ Patronoj
Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio (IPTEA) 528. v. ankaŭ Internacia Ligo por Esperanto en Poŝtoj, Telekomunikoj kaj Transportoj (ILEPTT)
Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) vi, 51, 250, 252, 265, 281, 292, 305, 512, 520-523, 527, 541, 603, 611, 613
Internacia Scienca Revuo v. Scienca Revuo
Internacia Seminario de GEJ 64, 265, 327, 537
Internacia Socia Revuo 302, 637, 643
Internacia Somera Universitato (ISU) 63, 265, 326, 327, 329-331, 336, 343, 344, 379, 387, 397, 401, 406, 557, 581, 599, 607, 608, 620, 622, 623, 681
Internaciaj Artaj Festivaloj 326 k.s.; 334, 387, 581, 622, 626, 627
Internaciaj Konferencoj v. Konferencoj
Internaciaj Organizaĵoj (ne E-aj) 8 k.s.; interŝtataj 8 k.s.; privataj 18
internacieco - de E. 38, 40, 41; de UEA 798
internaciismo - de Z 41; en E. 84, 550, 556, 718, 745; en UEA 584; ĝen. 563, 653, 723; proleta 727, 733, 736
interna ideo 41, 126, 369, 414, 417, 418, 425, 426, 428, 436, 444, 555
International Auxiliary Language Association (IALA) 149
interpretistoj v. tradukado
Irako 504
Irlando 101, 103, 467
Islamo 32, 258, 503. v. ankaŭ Korano
Islando 23, 341, 494, 623
Israelo 4, 89, 92, 95, 101, 103, 467, 546
Italio 4, 31, 50, 70, 82, 89-91, 95, 99,

101, 103, 107, 150, 176, 253, 320, 341, 394, 396, 468, 506, 623, 652, 653, 707, 754
jafetida skolo k. teorio 725-727, 738
Japana Esperanto-Instituto 50, 51, 300, 715, 718
Japana Socialista Partio (favora al E. en lernejoj) 96, 472
Japanio - eld. 51, 253, 259, 267-269, 304; instr. 70, 81, 96, 101, 103, 107, 754; kult. 53, 63, 316, 341; lit. 115, 116, 220, 241, 245, 262, 272; mov. 396, 470, 506, 650; persek. 652, 653, 714, 716
Jarlibroj - diversaj 83, 309, 310, 634, 642, 656; de UEA ĝen. 64, 310, 347, 440, 442, 577, 612, 619, 621, 622, 628, 634, 685, 804; de UEA informaj 89, 99, 102, 357, 358, 404, 425, 445, 446, 525, 562, 596-599, 603, 608, 610, 611, 620, 672, 675, 774, 779, 792
Jaro de Homaj Rajtoj 397, 400, 560, 581, 607, 627, 777. v. ankaŭ Konferencoj, Universala Deklaracio
Jaro de Internacia Kunlaboro (JIK) 389, 397, 403, 404, 406-409, 532, 560, 571, 600, 601, 606, 607, 623, 627, 673, 777-779, 782, 784, 785, 787, 788
Judoj 124-126, 367, 414, 438, 701-703, 708, 709, 714, 721. v. antisemitismo
Jugoslavia Esperanto-Federacio 85
Jugoslavia Esperanto-Ligo 85, 86, 96, 437, 474, 711, 713, 719
Jugoslavio - eld. 50, 253; instr. 70, 82, 84, 85, 90-92, 96, 99, 101-103, 107, 108; kult. 315, 316, 332, 334, 335, 399, 406; lit. 151; mov. 396, 473, 507, 645, 659, 710; persek. 84, 474, 522, 710 k.s.; PTT 364; R. 351; turismo 361
Junulara Sekcio de UEA v. Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)
junularo 320, 487, 500, 501, 534, 535, 539, 546, 626, 660. v. ankaŭ skoltoj, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)
jura-politika aspekto v. aspektoj de la lingva problemo
juro 73, 270, 282, 287, 304, 306. v. ankaŭ Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj
Kanado 50, 92, 96, 101, 103, 396, 475, 487
kantoj 47, 63, 76, 203, 209, 211, 214-216, 220, 233, 235, 237, 238, 314, 331, 482. v. ankaŭ Himno, muziko
kapitalismo 35, 123, 124, 126, 730, 739
kastoj 30, 34
kategorioj - lingvaj 113, 191; nelingvaj 114
katolikoj 257, 258. v. ankaŭ Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)
Kembriĝo v. Cambridge
klasoj sociaj 4, 8, 26, 30, 34, 46, 114, 118, 123, 124, 163, 164, 176, 636
klerigaj faktoroj v. faktoroj
kluboj v. societoj
København - Kn. 338, 655; mov. 459, 677; UK 323, 377, 385, 386, 391, 536, 582, 590, 591, 603, 616, 626, 668
Koko (eldonejo) 50
Kolekto Aprobita 48, 420
Kolekto de "La Revuo" 48
Köln - eld. 295; UK 391, 463, 558, 704
Kolombio 96, 495
Kolonjo v. Köln
komedio 143, 165, 185, 192, 193, 195, 196, 199, 200, 204, 206-209, 212, 215-217, 222, 224, 225, 228, 229, 231, 232, 320, 322, 325, 329, 331. v. ankaŭ dramo, teatro, tragedio
Komercaj Ĉambroj 355, 754.
komerco 24, 35, 282, 287, 354 k.s. v. ankaŭ Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio
Komitato de UEA - ag. 399, 432, 524, 549, 591, 633; decidoj 86, 93, 314, 401, 443, 545, 551, 571, 573, 574, 576, 580, 584-588, 601, 605, 607, 608, 612, 613, 670, 686, 719, 778, 795; kompetento 379, 582, 613, 618, 671; konsisto 85, 508, 565, 568, 611, 613; kunsidoj k. diskutoj 381, 404, 434, 559, 566, 575, 577, 583, 586, 590, 599, 602, 603, 617, 634, 681. v. ankaŭ Estraro de UEA, Universala Esperanto-Asocio
komunismo 50, 262-264, 641, 642, 645, 646, 650, 702, 703, 715, 718, 719, 724, 727, 730, 733, 736
Konferencoj - pri Homaj Rajtoj 22, 402; pri komerco 21, 22, 355; kulturaj E-aj 338, 394, 402; pri lernejoj 84, 86-88, 90-92, 458, 475, 622, 628, 752; pri PTT 363; pri teknika trad. 23; de Unesko 13, 99, 486, 587, 597, 598, 623, 624, 677, 761 k.s.
Kongo v. Zairo
Kongresa Gazetara Servo v. Gazetara Servo

Kongresa Libro 380, 387, 622. v. ankaŭ Universalaj Kongresoj
Kongresa Regularo v. Regularoj de UEA, Universalaj Kongresoj
Kongresoj (aliaj ol UK) 18, 61, 282, 288, 394, 408
Konstanta Komitato de la Kongresoj (KKK) 374, 424, 431. v. ankaŭ Universalaj Kongresoj
Konstanta Kongresa Sekretario (KKS) 376, 377, 379
Konsulta Komisiono pri Lernejoj (KKL) 86-88, 90, 93, 517, 518, 581, 622, 627
Konsultaj Rilatoj (kun UN k. Unesko) 362, 400, 604, 624, 773
Kontakto (revuo) 297, 445, 539, 540, 543, 545, 546, 612, 622, 627, 628, 662, 746, 804. v. ankaŭ Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)
Kontrakto de Helsinki 376, 432, 434, 436. v. ankaŭ Organizo de la E-Movado, Universala Esperanto-Asocio
Kopenhago v. København
Korano 258, 503. v. ankaŭ Islamo
Koreo 101, 103, 107, 475, 495
Koresponda Servo Mondskala (de UEA) 59, 76, 87, 581, 620, 622, 626.
korespondado 74, 76, 343, 447, 709, 720, 723; internacia komerca 357
Kraków 107; eld. 482; UK 130, 228, 317, 322, 391, 426, 428, 481, 578
Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) vi, 51, 55, 258, 308, 310, 394, 525, 526, 533
kristanismo 32, 126
kritiko literatura 141, 178, 300, 301
Kroatio 91
Kubo 254, 505
kultura agado de UEA 46, 50, 53, 62-64, 73, 76, 85, 314-320, 322, 323, 338-344, 362, 389, 394, 396-409, 799
kultura genocido 24, 389, 397, 608, 746
Kulturaj Centroj 53. v. ankaŭ Centro de Esploro kaj Dokumentado, Grésillon, Internacia Esperanto-Instituto, Japana Esperanto-Instituto
kursoj 53, 67, 72, 74, 76, 77, 79, 80-83, 98, 108, 265, 336, 649, 707, 715, 720, 749
kvakerismo 258, 526
Laborista Movado 70, 79, 262, 263, 302, 635 k.s., 712, 741. v. ankaŭ Laboristaj Esperanto-Asocioj, Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)
Laboristaj Esperanto-Asocioj (LEA) 640, 642, 648, 655, 659. v. ankaŭ Germana Laborista Esperanto-Asocio, Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj, Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)
Laborplanoj, Laborprogramoj de UEA v. Planoj kaj Programoj de UEA
La Estonto estas nia (LEEN) 477, 610, 706
La Laguna 104, 106, 188
Landaj Asocioj (LA) 47, 404, 437, 440, 447-451, 535, 538, 558, 568, 573, 576, 586, 587, 596-599, 603-605, 609, 610, 632, 767, 778; ag. 81, 91, 347, 395, 399, 403, 407, 524, 575, 659; politika sinteno 435, 509; unuopaj 378, 457, 467, 475, 485, 487, 490, 495, 588, 610, 613, 653, 656, 657, 700, 710, 720, 735, 741, 744
Latina Ameriko v. Ameriko
Latvio 90; SSR 98, 500, 501
legolibroj 67, 74, 80
Leipzig 644, 652; eld. 48, 279, 444, 445; Kn. 493, 647
leksikologio 57, 58, 73, 121
lektoratoj 450, 455. v. ankaŭ universitatoj
lernejoj (instruado de E.) 69, 70, 73, 76, 83 k.s., 108, 389, 400, 408, 701, 752-754, 784
lernolibroj 67 k.s., 70 k.s., 77, 79-81, 85, 123, 377, 645; Kontrolkomisiono de lernolibroj 69, 581, 620
Leteroj - de Z. 55, 131, 166, 446, 655, 803; de Lanti 164
Libano 495
libroj (nombro) 47. v. ankaŭ bibliotekoj
Libroservo de UEA 69, 619, 629
Liechtenstein 436
Liège 337, 453. v. ankaŭ Someraj Universitataj Kursoj
Ligo de Nacioj 8, 9, 13, 84, 257, 355, 363, 406, 432, 433, 435, 442, 444, 491, 748, 763
Linguaphone 80. v. ankaŭ instrumetodoj
Lingva Komitato 53, 54, 295, 418, 423, 664-667. v. ankaŭ Akademio de Esperanto
Lingvaj Respondoj 72, 128
lingvistiko 54, 56, 58, 73, 105, 166, 265, 270, 308, 645, 727, 738, 739, 741-744. v. ankaŭ esperantologio, filologio, inter-

lingvistiko
Lingvo Internacia (revuo) 52, 135, 138-140, 237, 293, 416, 446, 466, 483
lingvoj:
afrikansa 67-69, 172
aglutina 123
albana 67-69, 192, 506
angla 4-16, 20-23, 40, 97, 171, 172, 191, 197, 249, 545, 675, 689, 715, 739, 749, 751-753, 778; E-lerniloj 66-69, 77, 80, 127; E-propagando 597, 598, 602, 624, 677, 766, 767, 780, 782, 784; en plurlingvaĵo 57, 339, 683; trad. al 242, 244, 254, 308, 401, 404, 407, 666, 673; trad. el v, 171, 192 k.s., 216, 226, 237
araba v, 4, 13, 14, 20, 21, 32, 67-69, 197, 198, 238
armena 68, 69, 197, 238
"artefarita" 130, 757
baska 67-69
bretona 68, 69, 223
bulgara v, 67-69, 91, 197, 198, 237, 242, 244, 246
ĉeña v, 67-69, 167, 198, 199, 242, 244, 246-248
ĉerkesa (lit.) 200
ĉina v, 3, 10-12, 14, 15, 20, 22, 271, 490; E-lerniloj 68, 69; trad. al 242, 244, 246; trad. el 152, 176, 191, 201, 238, 240, 241
dana v, 13, 14, 67-69, 173, 202, 203, 237, 242, 244, 247, 673, 780
estona v, 67, 68, 203, 240, 242, 244, 248
etnaj (diversaj) 3, 4, 13, 30-32, 68, 69, 91, 178, 200, 208, 211, 216, 223, 235, 237, 238, 280
finna 13, 67-69, 203, 205, 237, 242, 244, 248, 342
flandra v, 67, 204, 237
franca 4-16, 20-23, 26, 38, 40, 122, 191, 197, 249, 545, 673, 675, 701, 739, 749, 751, 752, 755, 778; E-lerniloj 66-69, 77, 127; ties instr. per E. 340, 653, 750; E-propagando 295, 597, 598, 602, 624, 766, 767, 780, 782, 784; en plurlingvaĵo 57, 339, 683; trad. al 242, 244, 266, 308, 401, 407, 666, 673; trad. el 204 k.s., 237
frisa (lit.) 208
germana 4, 6, 13, 14, 16, 36, 57, 91, 116, 191, 249, 339, 666, 689, 721, 745; E-lerniloj 42, 66-69, 80; E-propagando 673, 675, 780, 782, 784; trad. al 127, 242, 244, 246, 401; trad. el 208, 210, 237
greka v, 3, 4, 40, 68, 237, 242, 244, 780; antikva v. helena
hebrea 13, 14, 36, 68, 69, 211, 221, 238, 242, 244, 673
helena 196, 198, 237, 256
hinda 13, 211, 238, 244
hispana v, 4, 5, 10-14, 16, 20-23, 254, 666, 689; E-lerniloj 67-69; E-propagando 597, 598, 624, 673, 766, 767, 780, 784; trad. al 242, 244, 401, 407; trad. el 211 k.s., 237
hungara 14, 67-69, 91, 147, 159, 214 k.s., 237, 242, 244, 246, 248, 401, 780
indonezia 69, 216
internacia (ne E.) 26, 28, 35, 36, 38, 40, 41, 52, 56, 66, 737
islanda v, 67-69, 172, 216, 242, 244, 246, 248
itala v, 4, 5, 13, 14, 67-69, 91, 216 k.s., 237, 242, 244, 246-248, 401, 666, 673, 689, 780
japana v, 13, 14, 67-69, 74, 192, 218 k.s., 237, 238, 240-242, 244-249, 271, 407, 673, 780
jida 67, 69, 221, 247; judgermana 68, 221; judhispana 68, 69
kartvela 68, 69, 222, 237, 238
kataluna v, 67-69, 222, 237
kimra 67-69, 280
kirgiza (lit.) 223
"klara" en telegrafado 363, 758
komuna 4, 5, 8, 15, 25, 34, 35, 41, 43, 56, 66, 720, 725, 737, 748, 752
korea 68, 69, 240
kornvala 223
kroata 14, 67-69, 91, 177, 178, 222, 237, 242, 244, 280, 780. v. ankaŭ serba
laboraj (en organizaĵoj) 9-13, 19-21, 23, 572, 778
laosa (lit.) 223
latina v, 4, 5, 7, 8, 14, 25, 26, 30, 31, 35, 40, 68, 69, 122, 223, 224, 237, 249, 739, 753
latva v, 67, 68, 224, 240-242, 244
litova 67-69, 224, 237, 240, 242, 244, 246
malaja 67-69
mongola 68, 69, 247

naciaj (diversaj) 4, 6, 8, 9, 11, 15, 20, 24, 26, 33, 35, 40, 41, 44-46, 57, 66-69, 79, 80, 91, 572, 660, 725, 737, 757, 763
nederlanda v, 4, 13, 14, 16, 67-69, 80, 192, 224, 237, 242, 244, 247, 254, 339, 407, 673, 689, 780, 784
neŭtrala 7, 8, 20, 26, 35, 36, 801
norvega 13, 14, 67-69, 225, 237, 242, 244, 247, 673
oficialaj (en organizaĵoj) 7, 9-14, 16, 18-21, 23, 572, 757
persa 4, 13, 67-69, 226
pola 14, 36, 66-69, 127, 133, 226 k.s., 230, 237, 238, 242, 244, 246, 247, 407, 666, 673
portugala v, 4, 13, 14, 67-69, 229, 237, 242, 244, 666, 673, 689
profesiaj 31, 32
provenca (lit.) 230, 237
romanĉa 67-69, 116, 230
rumana 67, 68, 230, 237, 242, 244, 247
rusa 4, 6, 10-16, 20-23, 36, 167, 191, 197, 249, 292, 666, 721, 733, 734, 737-741, 744, 745; E-lerniloj 42, 66-69, 499; E-propagando 780, 782; trad. al 127, 242, 244, 246; trad. el 133, 230, 237
sanskrito 30, 32, 123, 211, 238
serba 14, 67-69, 91, 178, 222, 237, 242, 244, 673, 780. v. ankaŭ kroata
sinhala 67-69
slovaka 67-69, 167, 199, 237, 247
slovena 14, 67-69, 91, 221, 222, 237, 242, 244
sveda 13, 67-69, 147, 159, 233, 237, 242, 244, 246, 248, 673, 780
teknikaj 30, 31
turka 4, 13, 68, 69, 244; turkaj-tataraj 40
ukrajna 67, 68, 235, 237, 244, 246
uzbeka 235
vjetnama v, 68, 69, 192, 236, 246, 247
liriko 118, 120, 130-132, 134-137, 147, 149, 152, 153, 155, 165, 168, 174, 175, 235. v. ankaŭ poezio
Literatura Mondo (eldonejo) 48, 49, 169, 174, 466, 485; AELA 167
Literatura Mondo (revuo) 135, 139, 144, 146-151, 154, 156, 157, 159, 166, 168, 169, 171, 173, 178, 196, 199, 200, 215, 217, 220, 222, 224, 235, 300, 301, 735. v. ankaŭ Budapeŝta Skolo
literaturo (E.) ĝen. 46-48, 50, 52, 80, 86, 113 k.s., 313-317, 416, 465, 483, 499, 566, 656, 668, 674, 765, 777, 797; en Belartaj Konkursoj 314 k.s.; en periodaĵoj 293-301; periodigo 117; valoro 120, 629; beletra v. beletro (orig. k. trad.); faka v. faka lit.; filozofia v. filozofia lit.; politika v. politika lit.; popularscienca 243, 249, 266; porinfana v. infanoj; priarta v. arto; religia v. religia lit.; scienca v. scienca lit.
literaturo originala kaj traduka v. beletro, poezio, prozo, skoloj, stilo, teatro
literaturo (ne E.) ĝen. kiel kleriga faktoro 33, 34, 684
Litovio 90, 652, 730; SSR 97, 500, 501, 732
Loka Kongresa Komitato (LKK) 376-380, 382. v. ankaŭ Universalaj Kongresoj
Lokaj Societoj (LS) v. societoj
London 53, 87, 322, 439, 574, 589, 592, 593; Kn. 402, 430, 648; UK 17, 319, 326, 377, 383, 386, 390-392, 455, 551, 553, 561, 578, 605, 617, 628, 675
Luksemburgo 395, 495
Madagaskaro 83, 96, 476, 503
Madrid - UK 319, 325, 326, 330, 386, 389, 392, 401-403, 465, 607, 608, 616, 617, 627, 686
Madridaj Tezoj 617, 795
Magnetofona Servo de UEA 61, 76, 342, 343, 581, 620, 622, 626. v. ankaŭ sonbendoj
Mainz 334, 677; UK 319, 323, 385, 391, 399, 463, 511, 579, 626
Malio 503
Malmö 391, 484, 485, 682
malpermesoj kontraŭ E. 48, 438, 463, 549, 555, 652, 653, 699, 701, 704, 705, 709, 712, 738, 749, 758. v. ankaŭ persekutoj
Malto 496
Maroko 101, 253, 503
Marseille 357; UK 322, 385, 391, 462, 510, 538
Martinus 51, 309, 532
meceneco 52
medicino 268, 282, 289, 304, 306
Meksikio 101, 168, 496
Membroj de UEA (ĝen.) 564, 568, 569, 575, 609, 632, 656, 657; Asociaj 568, 573, 609; Dumvivaj 611; Honoraj 497, 577, 587, 608, 609, 612, 613; Individuaj

425, 426, 433, 440, 538, 568, 569, 586, 587, 609, 611; (Abonantoj 347, 511, 577, 611, 612, 686, 687; Subtenantoj 611)
metodiko 85, 270, 729. v. ankaŭ instruado, instrumetodoj
Monako 477
Monda Lingvo-Problemo, La xxvii, 57, 64, 73, 253, 292, 308, 310, 402, 622, 627, 631, 674, 675, 686, 687, 746, 791, 804
Monda Organizaĵo pri Sano 11, 22, 23
Mongolio 245, 488, 496
Montevideo 99, 305, 486, 587, 588, 598, 601, 624, 673, 674, 677, 744, 765, 767, 769, 771
Montreal 349, 359
Moskvo 366, 644, 648; eld. 50, 499, 650; Kn. 500; mov. 126, 414, 501; R. 349
Mozambiko 400, 503
multlingveco v. plurlingveco
München 400; Kn. 252; mov. 414, 735, 742; UK 315, 319, 385, 387, 388, 391, 463, 670, 682
muziko 276, 282, 289, 304, 520. v. ankaŭ kantoj
naciismo 84, 265, 437, 555, 558, 584, 654, 698, 728, 796
Naciismo (Lanti) 648
nacioj 28, 33-35, 40-42, 76, 660
naziismo - ĝen. 554, 703; invado k. okupado 84, 200, 208, 210, 225, 229, 322, 349, 367, 450, 477, 481, 536, 679; malpermesoj 48, 297, 438, 463, 709; persek. k. neniigoj 85, 368, 440, 443, 457, 477, 652, 698 k.s., 713, 719, 732, 746
Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj 50, 477, 478, 669
Nederlando 6; eld. 50, 51, 217, 253, 295, 302, 308; instr. 82, 83, 89, 92, 96, 99, 101, 103, 107, 754; kult. 316, 341; mov. 396, 477, 507, 589, 610, 620, 623, 627, 650, 659, 677; PTT 363, 364
neologismoj 45, 127, 132, 138, 645. v. ankaŭ evoluo de E.
Nepalo 504
neŭtraleco 641, 649, 653, 657; de UEA 553, 584, 610, 798
neŭtralismo 642-644, 653, 715, 742
New York 359, 486, 783
Nica Literatura Revuo, La 119, 146-151, 156, 166, 168, 171, 178, 182, 186, 196, 199, 200, 222, 224, 301, 427
Nobel-Premio por la Paco (kandidatiĝo de UEA) xxv, 408, 409, 627, 674
Norda Prismo (revuo) 119, 148, 149, 154, 168, 172, 174, 180, 182, 215, 224, 226, 235, 301, 459, 484
normo lingva k. socia 46, 47, 113, 114; normigo en terminaroj 282
Norvegio 82, 92, 99, 101, 253, 306, 334, 479
Nova Epoko, La 119, 302, 645, 701
Nova Etapo, La 119, 302, 491, 650, 728, 747
noveloj k. rakontoj - orig. 137-139, 141, 142, 147-149, 154, 156, 159-164, 171, 173, 174, 176, 178-180, 182-185, 189, 295; trad. 193, 195, 197, 199-204, 206-212, 214, 215, 217, 220-226, 228-233, 235, 236, 240-242, 247, 248
Novjorko v. New York
Nov-Zelando 97, 99, 100, 101, 103, 332, 396, 407, 480
Nürnberg 127 365; eld. 50, 293, 481; Kn. 415; mov. 414, 447; UK 322, 391, 392, 463, 758
Oficiala Gazeto (de Akademio k. LK) 54, 295, 666
Okazaj Planoj 404, 600, 605. v. Planoj k. Programoj de UEA
Oksfordo v. Oxford
Oomoto vi, 154, 177, 178, 220, 259, 300, 309, 332, 472, 531, 716; eld. 51
opero, opereto v. teatro
Oratoraj Konkursoj 62, 317 k.s., 326, 327, 329, 330, 343, 344, 387, 406, 581, 607, 608, 620, 622, 623
oratoroj 43, 61, 62, 130, 131, 135, 152
Organizaĵo por Nutraĵo kaj Agrikulturo (FAO) 13, 22
Organizaĵoj (E-aj) ĝen. 47, 373, 407, 431, 447, 460, 463, 557, 609, 623, 655; rolo k. ag. 399, 400, 402-404, 408, 607, 633, 778, 779, 795-800; fakaj 508 k.s., 557, 558, 604, 636, 644, 661; instr. 76, 81; Kn. 394, 395; persek. 705, 706, 712
Organizo de la E-Movado 46, 374, 411 k.s., 584, 608
Oriento-Okcidento - projekto 397; Serio 50, 405, 406, 557, 604, 622, 627, 686, 777, 784; Seminario 338
Originala beletro, literaturo, poezio, prozo v. respektive beletro, literaturo, poezio, prozo

Originala Verkaro 55, 62, 72, 131, 167, 383, 410, 445, 803
ornitologio 521
ortografio 38, 40, 114
Oslo 332; UK 315, 319, 385, 388, 391, 479, 623, 682
Oxford UK 62, 322, 331, 391, 455
pacismo 260, 262, 282, 289, 304, 458, 530, 642, 745; Mondpaca Esperantista Movado (MEM) 500, 529, 533, 744
Paris 185, 293, 295, 357, 359, 361, 420, 644, 652; eld. 131, 298, 490; Kn. 252, 339, 650; R. 82, 349, 350; UK 315, 317, 318, 322, 385, 391, 392, 462, 553, 559, 623, 682, 735
Parnasa Gvidlibro 72, 146, 166
Paroladoj kaj Poemoj (de Z) 73, 131; festparolado 383
Patrono Dumviva de UEA 611; Honora Patrona Komitato de UEA 449, 485, 590, 608, 609, 612 k.s. v. ankaŭ Internacia Patrona Komitato de UEA
pedagogio 70, 73, 78, 84, 269, 282, 290, 306, 517, 747. v. ankaŭ instruistoj, lernejoj
Pekino - eld. 51, 264; mov. 490-492; R. 492
penso-kategorioj 118
periodaĵoj 293 k.s.; kulturaj 298; fakaj 304; politikaj 302. v. ankaŭ gazetaro
persekutoj kontraŭ E. 466, 474, 549, 555, 697 k.s.; nazi-faŝismaj 84, 85, 297, 368, 440, 443, 457, 477, 652, 698, 707, 713, 719, 732, 746; Stalinaj 232, 240, 263, 652-654, 720, 725, 728-733, 737, 744. v. ankaŭ malpermesoj kontraŭ E.
Peruo 505
Peterburgo 6, 414, 499, 522, 699
Peticio al Unesko xxvi, 389, 571, 581, 597, 600, 602, 605, 624, 766, 769. v. ankaŭ Unesko
Peticio al Unuiĝintaj Nacioj xxvi, 657, 669, 735, 748, 760. v. ankaŭ Unuiĝintaj Nacioj
Pirato, La (satira gazeto) 156
Planoj kaj Programoj de UEA 596 k.s.; Baza Laborplano 570, 571, 607, 609; Baza Laborprogramo 568, 570, 599-605, 608, 624, 626, 629, 633; Laborplanoj 398-400, 402, 404, 407, 408, 570, 571, 778, 784; Laborprogramoj 568, 570; Okazaj Planoj 404, 600, 605
Plena Gramatiko de Esperanto 57, 72, 803
Plena Ilustrita Vortaro 42, 48, 57, 70-72, 166, 283, 512, 520, 659, 803
Plena Vortaro 42, 48, 57, 71, 72, 166, 281, 283, 645, 656
plurlingveco 20-24, 752
poezio originala - ĝen. 50, 58, 72, 117, 245, 314, 315, 317; 1-a P. 52, 117, 129, 130, 132-138, 244, 293; 2-a P. 144-156, 159, 161, 165, 166; 3-a P. 47, 120, 167-178, 327, 483. v. ankaŭ beletro, liriko, skoloj
poezio traduka - ĝen. 47, 248, 314, 315, 317; de Z 130; el diversaj lingvoj 133, 136, 146, 147, 155, 156, 159, 166, 168, 176, 177, 196, 197, 201, 203, 205, 213-215, 219, 220, 224-227, 236-238, 240; el ĝermanaj lingvoj 148, 149, 168, 171, 172, 190, 192, 202, 204, 208, 210, 216, 226, 235, 241; el latinidaj lingvoj 206-208, 212, 214, 217, 218, 223, 224, 229, 230, 238, 327; el slavaj lingvoj 174, 176, 178, 199, 200, 221, 228, 230, 232, 233, 238. v. ankaŭ beletro, liriko, skoloj, tradukoj
politika aspekto v. aspektoj de la lingva problemo
politika literaturo 245, 246, 261, 274
politikaj periodaĵoj 302 k.s.
Pollando 6, 12; eld. 51, 229, 361, 364; instr. 89-92, 97, 99, 101, 103, 107; kult. 320, 326, 335; lit. 151; mov. 126, 367, 396, 399, 480, 545, 627, 656; persek. 367, 368, 481, 652, 706, 709, 735, 738
pontolingvo (E. kiel) v, 245, 497
popularscienca literaturo v. literaturo
portanto socia 28, 30, 34, 35, 40, 41, 45
Portland UK 362, 386, 390, 392, 395, 488, 578, 584, 605, 629, 719
Portoriko 101, 505
Portugalio 253, 497, 652, 710, 754
poŝtmarkoj 276, 364, 650. v. ankaŭ filatelo
Poŝto-Telegrafo-Telefono (PTT) 363, 364, 528
Praesperanto 126
Praha 106, 323, 457; Kn. 641; mov. 85, 534, 736; R. 349, 350; UK 84, 391, 431, 458, 751
praktikaj servoj de UEA v. servoj
prelegoj 76, 326, 328, 331, 336, 341, 398-400, 402, 406, 408, 447, 601, 622, 623
prelegvojaĝoj 340-342, 398, 426, 433, 435,

460, 479, 484, 557, 623
Presa Esperantista Societo 48, 49, 293, 461, 466
Prezidantoj de UEA - ag. 379, 404, 501, 549, 562, 585-587, 599, 606, 615, 617, 627, 654, 782, 789, 791; elektiĝo 433, 438, 441, 442, 589, 591, 613, 614; kompetento 381, 575, 576, 596, 618; morto 616; Honoraj 484, 485, 552, 591, 608, 609, 612, 616
profesio 41, 46. v. ankaŭ lingvoj profesiaj
projektoj de lingvo internacia 122, 123, 126
prononcado 40, 43, 76, 77, 80, 668. v. ankaŭ fonetiko
propagando 376, 416, 493
Propono al Unuiĝintaj Nacioj 389, 390, 473, 487, 581, 607, 627, 748, 778, 791. v. ankaŭ Peticio al UN
Protektantoj (de UK) 381, 382, 465, 479
Proverbaro Esperanta 72, 128
prozo originala 52, 73, 118, 130-132, 135, 137-142, 144, 147-149, 154-167, 171, 173 k.s., 314, 315, 317. v. ankaŭ beletro, eseo, literaturo, skoloj, stilo, noveloj, romano
prozo traduka 52, 128, 190-241, 314, 317, 483. v. ankaŭ beletro, literaturo, stilo, tradukoj, noveloj, romano
psikologia aspekto v. aspektoj de la lingva problemo
psikologio 73, 269, 282, 290
Pupteatraj Internaciaj Festivaloj (PIF) v, 333, 521
pupteatro 230, 333 k.s., 521. v. ankaŭ Hungara Ŝtata Pupteatro,
radikoj (en E.) 36, 42, 43, 46, 666, 756
radio - ĝen. 33, 34, 349 k.s., 406, 601, 624; elsendoj 43, 63, 342, 380, 399, 402, 407, 454, 455, 457, 475, 482, 485, 492, 495, 502, 505, 672, 689, 707, 735, 738, 769, 771; fakverkoj 242, 243, 267, 282, 290; instr. 76, 77, 80, 82, 83, 88, 460, 463, 469, 477, 494, 496; kult. 184, 322, 335, 626
rakontoj v. noveloj
rasismo 84, 560, 746
recenzoj v. kritiko literatura
Regularoj de UEA 612, 633; Ĝenerala 346, 575, 576, 582-584, 586, 608, 610; Kongresa 373, 374, 376-379, 410, 586, 608, 626
religia faktoro v. faktoroj
religia lingvo 32, 35
religia literaturo 128, 204, 211, 212, 217, 255 k.s.
religio 41, 47, 55, 255, 256, 282, 290, 308 v. ankaŭ teologio
Renkontiĝoj v. Konferencoj, Kongresoj
Retoriko (Lapenna) 56, 62, 64, 73, 121, 186, 188, 383, 747, 803
Revuo, La 52, 128, 135, 138-140, 144, 166, 298, 300, 510
Rezolucio de Unesko (1954) 67, 85, 88, 385, 551, 570, 588, 597, 598, 677, 748, 772, 773, 775 k.s.; al Unesko 388, 390. v. ankaŭ Peticio al Unesko
Rezolucio ĉe fondkunveno de SAT 641
Rezolucioj (dum UK) 388 k.s., 404, 407, 443, 712, 766, 779, 789, 790. v. ankaŭ Deklaracioj (dum UK)
Rezolucioj de sciencistoj favoraj al E. 251, 252, 339
Rio de Janeiro 51, 82, 349, 399
Roma 32, 391, 399, 469
Roma Imperio 4
romano - ĝen. 118, 120, 272, 326, 655; orig. 47, 50, 141, 147, 156, 159-163, 179-183, 241, 242, 244, 659; trad. 47, 128, 192, 193, 195, 196, 199, 200, 202, 204, 206-212, 215-218, 221-223, 225, 226, 228-229, 231-236. v. ankaŭ beletro, literaturo, prozo
Romo v. Roma
Rotterdam 295, 589, 590, 594, 595, 604, 620, 624, 630, 631; eld. 109, 310; Kn. 655, 656; UK 386, 389, 391-393, 478, 542, 616, 789, 790
Rumanio 79, 101, 103, 335, 367, 497, 745
Rusa Imperio 6, 124
Ruslando 6, 36, 125, 126, 293, 320, 363, 416, 447, 698, 699, 754. v. ankaŭ Rusa Imperio, Sovetunio
San Francisco 9-11, 20, 359; UK 391, 392, 488
satiro 136, 156, 159, 164, 173, 174, 180, 182, 185, 195, 200, 207, 225, 232. v. ankaŭ humuro
scienca literaturo 241, 245, 249, 254 k.s., 754
Scienca Revuo 250, 282, 285, 305, 339, 475, 512, 513, 519, 527, 746
scienca terminologio 123
scienco 34, 41, 47, 135, 188, 250, 265,

282, 291, 304, 305, 682, 683; valoro de E. en scienco 250
seksa faktoro v. faktoroj
Seminarioj 336; de GEJ 64, 394, 463
Senegalo 499
Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) 47, 431, 510, 641 k.s., 669; eld. 48, 50, 70, 232, 262, 304, 310, 478, 656; historio 55, 73, 164, 302, 458, 500, 641, 700; Kn. 340, 394, 395, 452, 453, 459, 475, 484, 485, 493, 499, 509, 657-659; mov. 459, 461-463, 472, 493, 510, 517, 701, 708, 720, 723, 724, 742. v. ankaŭ Laborista Movado
Sennacieca Revuo 156, 164, 302, 304, 309, 427, 637, 644, 645, 656, 661-663, 747
sennaciismo 164, 264, 265, 642, 644, 645, 653, 654, 660-662, 708, 728
Sennaciulo 265, 304, 644, 648, 655, 656, 659
Serbio 91
Serva Centro (de UEA) 442, 590, 596, 603, 620
Servoj (de la delegitoj de UEA) 348, 349
Servoj praktikaj de UEA 46, 348, 354, 365-368, 426, 557, 566, 569, 622
sintakso 58, 66, 73
Sirio 504
skoloj literaturaj diversaj 116-118, 120, 121, 131-133, 135-138, 141, 150, 152, 155, 162, 163, 167, 168, 173-177, 179, 183, 301. v. ankaŭ beletro, literaturo, poezio, prozo, Budapeŝta Skolo, Skota Skolo
skoltoj 61, 70, 282, 291, 331, 521, 542.
Skota Skolo 50, 120, 121, 168, 171, 172, 179, 184, 241, 298. v. ankaŭ skoloj literaturaj
Slovenio 91
socia aspekto v. aspektoj de la lingva problemo
socialismo 262, 265, 723, 733, 737, 739-742
socia portanto v. portanto socia
Societo franca por la propagando de E. (SFPE) 141, 461
Societo por la Propagando de E. (SPPE) 416, 460
Societoj lokaj 76, 77, 82, 109, 159, 346, 376, 414, 426, 447, 499, 501, 545, 609, 653, 672, 675, 699; ag. 404, 604, 605, 661; instr. 81, 84, 85, 88; Kn. 164, 185, 398, 588; kult. 320, 340, 343, 400; persek. 710 - 713, 734, 736
Sofia 104, 325; mov. 414, 456; R. 349-351, 707; UK 323, 326, 334, 386, 391, 392, 457, 498, 501, 527, 734
Somera Esperanto-Universitato (Gyula) 64, 337, 395, 467, 629
Someraj Universitataj Kursoj (Liège) 337, 338, 545, 686
sonbendoj 61, 67, 76, 77, 80, 342, 343, 516, 607
v. ankaŭ Magnetofona Servo de UEA
sonfilmoj v. filmoj
Sovetrespublikara Esperantista Unio kaj Sovjetlanda Esperantista Unuiĝo (SEU) 439, 489, 499, 500, 640, 646, 648, 650, 720-724, 726-732, 734, 741
Sovetunio 12, 164; eld. 51, 232, 302, 363, 364; instr. 82, 97, 101, 103; kult. 335, lit. 115, 151, 176; mov. 233, 432, 439, 499, 545, 610, 627, 646-650, 656;persek. 652-654, 720 k.s., 725, 728-733, 737-744; R. 350. v. ankaŭ Ruslando
sporto 282, 291
Stafeto (eldonejo) xxx, 50, 188, 465, 686
Statuto de UEA - akcepto 376, 442, 548, 549, 587, 624; modifo 558, 573-575, 585, 586, 590; preskribo 347, 379, 396, 439, 443, 508, 556, 559, 561, 563, 568, 569, 571, 578, 580, 582, 589, 591, 596, 605, 608, 610, 614, 618, 622, 633, 634, 798, 799. v. ankaŭ Regularoj de UEA
stenografio 276, 304
stilistiko 58, 73. v. ankaŭ stilo
stilo 121, 130, 131, 136, 138-140, 143, 149-151, 156, 158-160, 163, 164, 167, 174, 176, 179, 182, 185, 186, 188, 190, 227, 237, 300, 645. v. ankaŭ beletro, literaturo
Stockholm - Kn. 485, 654; mov. 483; UK 332, 391, 438, 440, 484
Studenta Tutmonda Esperantista Ligo (STELO) 84, 85, 513, 522, 541, 546
studentoj 308, 334, 513, 522
Sudafriko v. Afriko
Sudano 503
Suda Stelo, La (revuo) 135, 148, 177, 178, 182, 199, 200, 215, 222, 298, 300, 301, 343, 439, 474, 711, 712
Suda Vjetnamo v. Vjetnamo
Sveda Esperanto-Instituto 64, 336, 394,

484
Sveda Somera Semajno 64, 336, 394, 629, 677. v. ankaŭ Frostavallen
Svedio 51, 82, 91, 92, 99, 101, 103, 135, 148, 179, 183, 253, 293, 302, 315, 320, 336, 396, 483, 659
Svislando 51, 53, 59, 76, 82, 92, 97, 101, 103, 297, 367, 395, 396, 430, 440, 485, 514, 620, 754
ŝlosiloj 66, 67, 142, 377, 483, 494, 504, 506, 756
Tajlando 504
Tajvano 253, 504
Tanzanio 502
teatro - ĝen. 34, 47, 62, 76, 118, 120, 175, 314, 344, 387; orig. 135, 139, 143, 144, 147, 154, 161, 162, 164, 165, 168, 171, 173, 177, 184, 185, 321; trad. 184, 190, 192-196, 198-204, 206-213, 215-217, 219-226, 228-233, 235, 320-331; opero 151, 228, 322, 328, 329, 349; opereto 165. v. ankaŭ dramo, komedio, pupteatro, tragedio
teknikaj faktoroj v. faktoroj
teknike-lingva aspekto v. aspektoj de la lingva problemo
tekniko 282, 305
telegrafado 363
televido 33, 34, 80, 83, 335, 342, 380, 455, 458, 478, 626. v. ankaŭ radio
teologio 255, 290, 308. v. ankaŭ religio
terminaroj fakaj 70, 72, 280 k.s., 510, 513, 514, 519-521, 622, 668, 687, 689
terminologio 73, 123, 167, 280 k.s., 722
Testamento Malnova, Nova v. Biblio
Togo 503
Tokio - Kn. 546; mov. 490; UK 324, 326, 375, 386, 391, 392, 406, 472, 607, 627
tradukado - en internaciaj organizaĵoj 15, 20-24, 26; eraroj 16; kosto 20-24, 26; taŭgeco de E. 38.
tradukoj al E. 38; de Z. 47, 74, 128-130, 190; ĝen. 74, 115, 190 k.s., 317; 1-a P. 52, 133, 135-144, 190; 2-a P. 144, 146-149, 151, 152, 154-156, 159-162, 164, 166, 167, 650, 722; 3-a P. 47, 165, 168, 169, 171-178, 182, 184, 186, 314, 405, 557
tradukoj el E. v, 38, 133, 152, 171, 176, 188, 191-196, 201, 204-208, 210, 211, 230, 237, 238, 240-248, 644
tragedio 171, 192, 193, 195, 196, 198, 206, 208-210, 225, 228, 233. v. ankaŭ dramo, komedio, teatro
Travailleur Espérantiste, Le v. Esperantista Laboristo
triboj 3, 31, 32, 34, 41, 46
Tunizio 503
turismo 360 k.s., 390; per E. 61, 353, 364, 387, 394, 395, 424, 484, 487, 504, 514, 524, 542, 622, 708; fakvortaroj 282, 291; filmoj, gvidlibroj, prospektoj 360, 361, 457, 479, 480, 495, 754; periodaĵoj 304, 306, 361, 524
Turkio 161, 504, 505
Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE) 83, 84, 517. v. ankaŭ instruistoj, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) 47, 86, 477, 496, 501, 504, 518, 522-524, 535 k.s., 616, 617, 622, 626, 659; Kn. 62, 339, 340, 386, 394, 465, 484, 535, 536, 538, 539, 542-544, 627, 629; kult. 64, 310, 406, 448, 608, 746, 782. v. ankaŭ Kontakto
Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA) 400, 518, 736. v. ankaŭ gazetaro, periodaĵoj
Unesko 87, 88, 93, 338, 362, 397, 398, 401-407, 442-444, 462, 484, 500, 549, 560, 584, 606, 608, 622, 657, 671, 674, 760, 778, 784; dokumentado 280, 292, 399, 675; Naciaj Komisionoj 86, 624; konsultaj rilatoj 400, 604, 624, 773; lingva problemo 11, 13, 20-23, 757; Ĝenerala Konferenco 99, 486, 587, 623, 677, 744, 761, 767, 772-774; Rezolucio al 388, 390; Rezolucio de v. Rezolucio. v. ankaŭ Peticio al Unesko
Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj 20, 33, 396-403, 408, 443, 511, 559, 600, 605-607, 622, 627. v. ankaŭ Jaro de Homaj Rajtoj
Universala Ekspozicio de Esperanto 486, 598, 601, 602, 624, 677, 765, 768, 769, 791
Universala Esperanto-Asocio (UEA) 1) kiel organizaĵo: xxv, xxix, 424 k.s., 490, 535, 548 k.s., 659, 661, 708, 802; ag. 88, 313, 376, 394, 396, 397, 402,

654, 760, 761, 765 k.s., 797 k.s.; domo 592 k.s.; atakoj k. kalumnioj kontraŭ 487, 582-584, 717, 719; konsisto 47, 447 k.s., 503, 609, 656, 744; letero al Stalin 745; pasiveco antaŭ faŝismo 711; subvencioj 669, 672; 2) vidota
2) vidota respektive sub: bibliotekoj, Centra Oficejo, Centro de Esploro kaj Dokumentado, Delegitoj, Eldona Fako, Esperanto (revuo), Estraro, fondo kaj historio, Informa Fako, Institucio Hodler, Internacia Ekzamena Komisiono, Internacia Gazetara Servo, Internacia Patrona Komitato, Internacia Somera Universitato, Jarlibroj, Komitato, Konsultaj Rilatoj, Koresponda Servo Mondskala, Libroservo, Magnetofona Servo, Membroj, Planoj kaj Programoj, Prezidantoj, Regularoj, Serva Centro, Servoj, Statuto, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, Universalaj Kongresoj.
Universala Federacio Esperantista (UFE) 435, 437, 438
Universalaj Kongresoj - ĝen. 18, 83, 88, 310, 318, 322, 373 k.s., 420, 432, 461, 480, 504, 516, 519, 524, 568, 577, 581, 603, 604, 614, 622, 672, 681; 1-a P. (1905-1915) 130, 228, 250, 302, 314, 322, 346, 360, 369, 370, 417 k.s., 424-428, 455, 512, 578, 664, 665, 699; 2-a P. (1920-1939) 52, 62, 83, 317, 322, 331, 332, 431, 433, 440, 452, 455, 678, 681, 701, 704, 712, 714, 751, 758; 3-a P. (1947-1960) 314, 315, 317-319, 323, 399, 443, 455, 492, 579, 580, 582, 586-591, 593, 596, 614, 670, 682, 735, 766; (1961-1974) 17, 315, 319, 323-332, 344, 362, 401, 404, 406, 407, 452, 455, 545, 578, 584, 603, 616, 617, 668, 675, 682, 719, 722, 734, 779, 789, 790
Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) vi, 51, 252, 281, 306, 519
Universala Vortaro 42, 54, 66, 127, 128, 666
universaleco de UEA 553, 584, 798
universalismo 796
universitatoj (en kiuj E. estas instruata) 83 k.s., 88, 89, 98, 99, 103 k.s., 400, 408, 450, 455, 457, 460, 465, 476, 478, 491, 495, 502, 505, 622
Unua Libro 35, 38, 47, 66, 126, 127, 190, 370, 413, 414, 480, 483, 486, 499
unuecigaj faktoroj v. faktoroj
unueco - lingva 29, 43, 77, 797; de UEA 561
Unuiĝintaj Nacioj xxix, 9-13, 15, 17, 19-23, 397-404, 406-408, 442-444, 484, 549, 560, 602, 604, 622, 623, 671, 757, 760; Ĉarto 10, 20, 402, 512; Ĝenerala Asembleo 10-13, 400, 559, 606, 778, 784, 787-789. v. ankaŭ Peticio al UN, Propono al UN
Unuiĝo Internacia de Marionetistoj (UNIMA) 335. v. ankaŭ pupteatro
Urugvajo 101, 486, 765, 769, 771
Usono 8, 12, 195, 534; eld. 253; instr. 82, 83, 89, 92, 98, 99, 101, 103, 108, 754; kult. 341; lit. 254; mov. 392, 396, 486, 507, 584, 627, 629, 650, 719; R. 349
Varsovio v. Warszawa
Vaŝingtono v. Washington
Venezuelo 82, 399, 502
Versailles, 8, 9, 13
Vieno v. Wien
virinoj 31, 139, 143
Vjetnamo 101, 245, 273; Norda 51, 236, 263, 502; Suda 264, 504
Volapük 123, 124, 126, 130, 413-415, 449, 462, 700
vortaroj 67, 166, 377; de Kabe 57, 141; rimaroj 57, 58. v. ankaŭ Plena Vortaro, Plena Ilustrita Vortaro, terminaroj fakaj
vortfarado 73, 140, 142, 166
vortprovizo, vorttrezoro 46, 70, 81, 127, 756
Warszawa 127; eld. 48, 65, 126, 310, 467; mov. 414, 481, 677, 735; R. 349, 350, 353, 354; UK 319, 323, 325, 384, 385, 391, 392, 482, 606, 614, 626, 714
Washington UK 322, 391, 392, 487, 639
Wien 94, 104, 450, 451; Kn. 449, 452; mov. 85; R. 82; UK 83, 319, 322, 326, 381, 386, 389, 391, 392, 440, 452, 491, 545, 578, 617, 628
Zagreb 107, 333-335, 513; Kn. 521, 719; mov. 84, 85, 474, 713; R. 351, 353, 399; UK 315, 385, 391, 475, 586, 598, 599, 766
Zairo 488, 503

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO

FAKTOJ KAJ ANALIZOJ PRI LA INTERNACIA LINGVO

Verkita de
IVO LAPENNA
D-ro pri juro, D-ro hc. pri Internaciaj Rilatoj
Profesoro en la Universitato de Londono
Honorofica Direktoro de CED

ĈEFREDAKTORO

ULRICH LINS (REDAKTORO) KAJ TAZIO CARLEVARO

1974
Universala Esperanto-Asocio

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO
PRI LA
MONDA LINGVO-PROBLEMO

London — Rotterdam

AŬTOROJ DE UNUOPAJ ĈAPITROJ

Prof. D-ro Ivo Lapenna:	Ĉap. 1, 2, 4, 11-13, 18, 20.2, 20.4, 20.5-20.8, 22 kaj 23.
Tazio Carlevaro:	Ĉap. 3 kaj 5-10.
Ulrich Lins:	Ĉap. 14-17, 19, 20.1, 20.3 kaj 21.

REDAKCIO
Ĉefredaktoro Prof. D-ro Ivo Lapenna
Redaktoro Ulrich Lins
Teknika Redaktoro D-ro Victor Sadler
Ilustraĵojn prizorgis Simo Milojević

© 1974
Centro de Esploro kaj Dokumentado
pri la Monda Lingvo-Problemo (CED)
(Universala Esperanto-Asocio)

Ĉiuj rajtoj rezervitaj. Reprodukto, ekstrakto aŭ traduko en kiun ajn lingvon nur kun la skriba permeso de CED.

Presita en Nederlando.

NOMARO DE KUNLABORINTOJ

La valora helpo, kiun multaj personoj donis al la aŭtoroj de unuopaj ĉapitroj en diversaj formoj, estas danke rekonita en la Antaŭparolo. Iliaj nomoj (*) kun koncizaj informoj pri la karaktero de la kontribuoj aperas en la suba listo, aranĝita laŭ ĉapitroj:

Ĉap. 4: Günther Becker liveris plurajn utilajn informojn.

Dua Parto (Ĉap. 5-10): Valorajn sugestojn donis R. Haupenthal kaj Simo Milojević. Informojn pri tradukoj el naciaj literaturoj liveris William Auld (angla), † D-ro Italo Chiussi (araba), Venelin Mitev (bulgara), D-ro Vlastimil Novobilský (ĉeĥa), D-ro Victor Sadler (ĉina), Poul Thorsen (dana), Jaan Ojalo (estona), P. de Smedt (flandra), D. B. Gregor (greka kaj latina), Hispana Esperanto-Federacio (hispana kaj kataluna), Baldur Ragnarsson (islanda), D-ino Clelia Conterno-Guglielminetti (itala), Miyamoto masao (japana), Mirdza Burgmeister (latva), † G. J. Degenkamp (nederlanda), R. P. Nogueira (portugala kaj brazila), Dao-anh-Kha (vjetnama). Skizon pri la kontribuo de Ĉeĥoj al la originala literaturo de Esperanto sendis D-ro V. Novobilský, kaj informojn pri tradukoj el Esperanto en naciaj lingvoj kaj pri Esperanto kiel „pontolingvo" donis D. B. Gregor.

Ĉap. 10: Roman Dobrzyński afable disponigis resumon de sia tezo pri la Esperanta gazetaro.

Ĉap. 11: Emilija Lapenna donis statistikajn informojn pri la Belartaj Konkursoj por 11.2, dum Z. Tišljar sendis materialojn pri PIF por 11.7.

Ĉap. 15: Manuskriptojn pri la Esperanto-Movado en diversaj landoj liveris Jorge Hess (argentina), F. R. Banham (aŭstralia), † D-ro E. J. Görlich (aŭstria), Norman Williams (brita), Nikola Aleksiev (bulgara), Jaroslav Mařík (ĉeĥoslovaka), Irja Klemola (finna), Jean Thierry (franca), Sokratis Sakellaropoulos (greka), Hispana Esperanto-Federacio (hispana), D-ro István Szerdahelyi (hungara), P. J. O'Reilly (irlanda), D-ro Ettore Aprosio kaj D-ro Carlo Minnaja (itala), Marinko Gjivoje (jugoslavia), Kanada Esperanto-Asocio (kanada), † G. J. Degenkamp (nederlanda), D-ro C. Støp-Bowitz (norvega), † William H. King (novzelanda), Jan Zawada (pola), Colin Beckford (sudafrika),

NOMARO DE KUNLABORINTOJ

D-ro Arthur Baur (svisa), † E. Sonnenfeld (urugvaja), Mark Starr (usona), s-ino M. Haudebine kaj P. Daŝgupto (hinda), Miguel Pérez-González (kolombia), Prof. Salah Ghanem (libana), Carmel Mallia (malta), Dao-anh-Kha (vjetnama). Krome, disponigis materialojn aŭ donis sugestojn Fernand Roose (belga), R. P. Nogueira (brazila), O. C. Lange (dana), Prof. J. Régulo-Pérez (hispana), Miyamoto masao (japana), Jan Strönne (sveda), Ĉina Esperanto-Ligo (ĉina), Baldur Ragnarsson (islanda), † José Serrano (meksika).

Ĉap. 16: Manuskriptojn pri fakaj asocioj liveris Joachim Giessner (IFEF), Prof. D-ro Ivo Lapenna (IEAJ), Prof. D-ro Boža Popović (ISAE), Giuseppe Grattapaglia (IEKA), Hans Breitenbach (LIBE), Hermann Heiss (ELF), Tibor Sekelj (IGA), Niilo Kavenius (TEĴA), G. B. Briano (MEL), D-ro Wim de Smet (ORE), † Douglas Murphy (SEL), F. Morawetz (BLE), Stefan Maul (IKUE), H. A. de Hoog (KELI), Alfred G. Tucker (KES), Nikola Aleksiev (MEM), Umeda joŝimi (Oomoto). Krome, konsilojn kaj sugestojn donis D-ro Donald Broadribb (IABO), D-ro A. Albault (UMEA) kaj A. G. Tucker (IMRO).

Ĉap. 19: La unuan malneton tralegis kaj faris utilajn rimarkojn N. Barthelmess, E. Borsboom kaj S. Milojević.

Ĉap. 20: Prof. G. Waringhien kaj R. Haupenthal verkis 20.1; materialo disponigita de IEMW servis kiel bazo por verkado de 20.3; en la kompilado de 20.5 kunhelpis f-ino Marianne Vermaas; Jean Thierry liveris la manuskripton por 20.7.

Ĉap. 21: La aŭtoro dankas la estiĝon de la nun publikigita versio al la disponigo de informoj kaj konsiloj de multaj personoj, el kiuj estu menciitaj la jenaj: Isaj Dratwer, Marinko Gjivoje, Kobajaŝi cukasa, Kurisu kei, Prof. I. Lapenna, † Prof. Lucien Laurat, Mijake ŝihej, Miyamoto masao, † Nikolaj Rytjkov, † Hermann Theobald, D-ro Hj. Unger, L. Zaleski-Zamenhof. Helpis ankaŭ institucioj, inter kiuj Bundesarchiv Koblenz, Institute of Contemporary History (London) kaj Rijksinstituut voor Oorlogsdocumentatie (Amsterdam).

Persona indekso: Tazio Carlevaro.

Tema indekso: Henri Vatré.

Tuta Verko: Aparte menciinda estas la tre valora kontribuo de Henri Vatré, kiu, aldone al la tema indekso, plej atente tralegis la unuajn presprovaĵojn kaj helpis forigi, krom tajpaj, ankaŭ plurajn erarojn pri faktoj en diversaj partoj de la libro. Siavice, Simo Milojević multe helpis al la teknika redaktoro per konsiloj kaj sugestoj. La presprovaĵojn korektis ne nur la aŭtoroj kaj la sekretariino de CED Lj. Lapenna, sed ankaŭ, tre konscience, Robert Moerbeek, oficisto de la CO de UEA.

*) Kruceto antaŭ la nomo indikas, ke la koncerna kontribuinto forpasis.

ENHAVTABELO

Nomaro de Kunlaborintoj v
Antaŭparolo xxv

UNUA PARTO
Esperanto kiel Solvo de la Lingva Demando en Mondaj Kadroj

ĈAPITRO 1
La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj

1.1 KONCIZA HISTORIA TRARIGARDO 3
1.1.1 **Enkondukaj Rimarkoj** 3
1.1.2 **La Latina kaj Franca Precedencoj** 5
1.1.3 **Angla-Franca Kunregado en la Ligo de Nacioj** . . . 8
1.2 NUNA SITUACIO 9
1.2.1 **Oficialaj kaj Laboraj Lingvoj** 9
1.2.2 **Plia Komplikiĝo de la Problemo** 11
1.3 DIVERSAJ ASPEKTOJ 15

1.3.1	**Teknike-Lingva Aspekto**	15
1.3.2	**Socia Aspekto**	16
1.3.3	**Psikologia Aspekto**	19
1.3.4	**Jura-Politika Aspekto**	19
1.3.5	**Ekonomia Aspekto**	20
1.4	SOLVO	24
1.5	ESENCA BIBLIOGRAFIO	27

ĈAPITRO 2

La Internacia Lingvo (Esperanto)

2.1	FAKTOROJ INFLUANTAJ LA LINGVO-EVOLUON	28
2.1.1	**Lingvo kiel Socia Fenomeno**	28
2.1.2	**Diferencigaj Faktoroj**	29
2.1.3	**Unuecigaj Faktoroj**	32
2.1.4	**Evolutendenco**	34
2.2	EKESTO DE LA INTERNACIA LINGVO	35
2.3	STRUKTURO KAJ VALORO	36
2.3.1	**Deveno**	36
2.3.2	**Internacieco**	38
2.3.3	**Socia Portanto**	41
2.4	EVOLUO	42
2.5	ESENCA BIBLIOGRAFIO	44

ĈAPITRO 3

La Esperanta Kulturo

3.1	KULTURO KAJ TRADICIO	45
3.2	KOLONOJ DE LA ESPERANTA KULTURO	46
3.2.1	**Enkonduko**	46
3.2.2	**Organizita Movado**	46
3.2.3	**Esperanta Libraro**	47
3.2.4	**Esperantaj Eldonejoj**	48
3.2.5	**Esperantaj Bibliotekoj**	51
3.2.6	**Belartaj Konkursoj**	52

3.2.7	**Kulturaj Centroj**	53
3.2.8	**Lingvaj Institucioj: La Akademio**	53
3.2.9	**Esperantologia Literaturo**	54
3.3	DE SKRIBA AL PAROLATA LINGVO	58
3.3.1	**Signifo de la Parola Kulturo**	58
3.3.2	**Faktoroj**	59
3.4	ESENCA BIBLIOGRAFIO	64

ĈAPITRO 4
Instruado de Esperanto

4.1	ENKONDUKO	65
4.2	ŜLOSILOJ	67
4.3	LERNOLIBROJ KAJ INSTRUAJ HELPILOJ	67
4.3.1	**Nacilingvaj Lernolibroj**	68
4.3.2	**Internaciaj Lernolibroj**	70
4.3.3	**Libroj por Superaj Kursoj kaj Instruistoj**	72
4.3.4	**Helpaj Instruaj Rimedoj**	74
4.3.5	**Postredakta Noto**	77
4.4	INSTRUMETODOJ	77
4.5	EKSTERLERNEJA INSTRUIĜO	80
4.5.1	**Memlernantoj**	80
4.5.2	**Kursoj de Esperanto-Societoj**	81
4.5.3	**Aliaj Kursoj**	82
4.6	LERNEJOJ KAJ UNIVERSITATOJ	83
4.6.1	**Agadoj en Lernejaj Medioj**	83
4.6.1.1	Antaŭ la Dua Mondmilito	83
4.6.1.2	Postmilita Periodo	85
4.6.2	**Juraj Eblecoj por Instruado de Esperanto**	93
4.6.3	**Lernejoj kun Esperanto kiel Studobjekto**	98
4.6.4	**Universitatoj**	103
4.6.5	**Konkludaj Rimarkoj**	108
4.7	ESENCA BIBLIOGRAFIO	109

DUA PARTO
Literaturo

ĈAPITRO 5
Karakterizoj de la Esperanta Literaturo

5.1 ESPERANTO KAJ LITERATURO 113

5.2 ESENCAJ TRAJTOJ 115

5.2.1 **Enkonduko** 115

5.2.2 **Literaturscienca Studo pri Originalaj Esperanto-Verkistoj** 118

5.2.3 **Ĝeneralaj Karakterizoj de la Esperanta Literaturo** . . 119

5.3 ESENCA BIBLIOGRAFIO 121

ĈAPITRO 6
Originala Beletro

6.1 LA MONDLINGVA SITUACIO INTER 1850 KAJ 1887 122

6.1.1 **Mondlingvaj Provoj** 122

6.1.2 **Volapük** 123

6.2 SOCIA KAJ HEJMA MEDIO DE L.L. ZAMENHOF 124

6.3 UNUAJ LINGVAJ PROVOJ 125

6.4 APERO DE LA „UNUA LIBRO" 126

6.5 L.L. ZAMENHOF: VERKARO KAJ SIGNIFO . . 127

6.5.1 **Unuaj Verkoj** 127

6.5.2 **Instruaj Verkoj.** 127

6.5.3 **Tradukaj Verkoj** 128

6.5.4 **Originalaj Poemoj** 130

6.5.5 **Originalaj Eseoj** 130

6.5.6 **Oratoraĵoj** 130

6.5.7 **Gazetartikoloj kaj Leteroj** 131

6.5.8 **Kolektitaj Verkoj** 131

6.6	ORIGINALA BELETRO 1887-1918	131
6.6.1	**Enkonduko**	131
6.6.2	**La Unuaj Komunaj Verkoj**	132
6.6.3	**La Poeziaj Skoloj de la Unua Periodo**	132
6.6.4	**La Prozaj Skoloj de la Unua Periodo**	137
6.6.5	**La Originala Teatro dum la Unua Periodo**	143
6.6.6	**Konkludaj Verkoj**	144
6.7	ORIGINALA BELETRO 1919-1945	144
6.7.1	**Poezio**	144
6.7.2	**Prozo**	156
6.7.3	**Teatro**	164
6.7.4	**Kulture Gravaj Verkistoj**	166
6.8	ORIGINALA BELETRO 1945-1972	167
6.8.1	**Poezio**	167
6.8.2	**Prozo**	179
6.8.3	**Teatro**	184
6.8.4	**Satiraj Verkistoj**	185
6.8.5	**Kulture Gravaj Verkistoj**	186
6.9	ESENCA BIBLIOGRAFIO	188

ĈAPITRO 7
Traduka Beletro

7.1	ENKONDUKO	190
7.2	ĈEFAJ VERKOJ (alfabete laŭ lingvoj)	192
7.3	ANTOLOGIOJ DE TRADUKOJ	236
7.3.1	**Enkonduko**	236
7.3.2	**La Unua Periodo**	237
7.3.3	**La Dua Periodo**	238
7.3.4	**La Tria Periodo**	240
7.4	ESPERANTO KIEL FONTO-LINGVO	241
7.4.1	**Scienca Literaturo**	241
7.4.2	**Beletro**	242
7.4.3	**Resume**	244

7.5 ESPERANTO KIEL PONTO-LINGVO 245

7.6 ESENCA BIBLIOGRAFIO 248

ĈAPITRO 8

Scienca, Popularscienca kaj Faka Literaturo

8.1 ESPERANTO KAJ SCIENCO 249

8.1.1 **La Lingva Problemo en la Scienco** 249
8.1.2 **Valoro de Esperanto por la Scienco** 250

8.2 ESPERANTO KIEL RESUMLINGVO EN SCIENCAJ ELDONAĴOJ 252

8.3 VERKOJ LAŬ FAKOJ 254

8.3.1 **Filozofio** 254
8.3.2 **Teologio kaj Religio** 255
8.3.3 **Religia Literaturo** 256
8.3.4 **Pacismo** 260
8.3.5 **Socialismo** 262
8.3.6 **Ekzaktaj Sciencoj kaj Naturaj Sciencoj** 265
8.3.7 **Sociaj Sciencoj** 269
8.3.8 **Arto** 275
8.3.9 **Kuirarto** 276
8.3.10 **Filatelo** 276
8.3.11 **Stenografio** 276
8.3.12 **Biografioj** 277

8.4 ESENCA BIBLIOGRAFIO 279

ĈAPITRO 9

Fakaj Terminaroj

9.1 ĜENERALA PRISKRIBO 280

9.1.1 **La Fakterminologia Lingvoproblemo** 280
9.1.2 **Tutmonda Fakterminologia Situacio** 280
9.1.3 **Historia Skizo de la Fakterminologio en Esperanto** . . 281
9.1.4 **Strukturo de la Terminaroj** 281
9.1.5 **Scienca Signifo de la Fakterminologio** 281

9.2 KATALOGO DE ĈEFAJ TERMINAROJ 283

9.3 ESENCA BIBLIOGRAFIO 292

ĈAPITRO 10
Periodaĵoj

10.1 PERIODAĴOJ KUN ĜENERALINFORMA ENHAVO 293
10.1.1 **Komenciĝo de la Movado** 293
10.1.2 **Ĝis la Unua Mondmilito** 295
10.1.3 **La Intermilita Epoko** 295
10.1.4 **Post la Dua Mondmilito** 295

10.2 ĈEFAJ LANDAJ ORGANOJ 297
10.2.1 **Historia Skizo** 297
10.2.2 **Hodiaŭa Situacio** 298

10.3 KULTURAJ REVUOJ 298
10.3.1 **Ĝis la Unua Mondmilito** 298
10.3.2 **Intermilite** 300
10.3.3 **Post la Dua Mondmilito** 300

10.4 POLITIKAJ PERIODAĴOJ 302
10.4.1 **Historia Trarigardo** 302
10.4.2 **Hodiaŭa Situacio** 304

10.5 FAKAJ PERIODAĴOJ 304
10.5.1 **Ĝeneralaj Trajtoj** 304
10.5.2 **Scienco kaj Tekniko** 305
10.5.3 **Fotografia Optiko** 305
10.5.4 **Kemio** 305
10.5.5 **Bibliologio** 305
10.5.6 **Geografio** 305
10.5.7 **Astronomio kaj Natursciencoj** 305
10.5.8 **Fervojistaj Aferoj** 306
10.5.9 **Juro** 306
10.5.10 **Ĵurnalismaj Aferoj** 306
10.5.11 **Pedagogio** 306
10.5.12 **Medicino** 306
10.5.13 **Gepatroj kaj Infanoj** 306
10.5.14 **Turismo kaj Aŭtomobilismo** 306

23.2 SPONTANECO KAJ SIGNIFO DE ORGANIZITA LABORO 796
23.2.1 **Neceso Difini la Rolon** 796
23.2.2 **Konkludo** 801

Ĝenerala Bibliografio 803
Listo de Mallongigoj 805
Indekso de Personoj 809
Indekso de Temoj . . . . . .

11.6	FILMO	331
11.7	PUPTEATROJ	334
11.8	KURSOJ KAJ SEMINARIOJ SUR UNIVERSITATA NIVELO	336
11.8.1	**Internacia Somera Universitato (ISU)**	336
11.8.2	**Kursoj kaj Seminarioj**	336
11.8.3	**Gravaj Sporadaj Konferencoj**	338
11.9	ALIAJ FORMOJ	340
11.9.1	**Ĝeneralaj Kulturaj Aranĝoj**	340
11.9.2	**Prelegvojaĝoj**	340
11.9.3	**Sonbendaj Programoj kaj Personaj Kontaktoj**	342
11.10	ESENCA BIBLIOGRAFIO	343

ĈAPITRO 12

Uzo por Praktikaj Celoj

12.1	IOM PRI PRAGMATISMO	345
12.2	DELEGITA RETO	346
12.2.1	**Origino**	346
12.2.2	**Organiza Strukturo**	346
12.2.3	**Servoj**	348
12.3	RADIO	349
12.3.1	**Komenciĝoj**	349
12.3.2	**Postmilita Periodo**	349
12.4	KOMERCO KAJ INDUSTRIO	354
12.4.1	**Konciza Historia Trarigardo**	354
12.4.2	**Nuna Situacio**	357
12.5	MONDAJ EKSPOZICIOJ	358
12.6	TURISMO	360
12.6.1	**Enkonduka Rimarko**	360
12.6.2	**Faldfolioj kaj Prospektoj**	360
12.6.3	**Gvidlibroj**	361

12.6.4 **Periodaĵoj** 361
12.6.5 **Perspektivoj por la Estonteco** 362

12.7 POŜTO-TELEGRAFO-TELEFONO (PTT) 363

12.7.1 **Ĉefaj Historiaj Datoj** 363
12.7.2 **Poŝtmarkoj kaj Poŝtaj Stampoj** 364

12.8 INTERNACIAJ FAKAJ INTERŜANĜOJ 365

12.9 PRAKTIKA HUMANECA LABORO 365

12.9.1 **Unua Mondmilito** 365
12.9.2 **Dua Mondmilito** 367

12.10 ESENCA BIBLIOGRAFIO 368

ĈAPITRO 13

Instrumento de Internacia Kompreniĝo

13.1 MEMEFIKO KAJ LAŬCELAJ AGADOJ 369

13.2 UNIVERSALAJ KONGRESOJ 373

13.2.1 **Enkonduka Rimarko** 373
13.2.2 **Evoluo de la Organizaj Formoj** 374
13.2.3 **Nuntempa Strukturo** 377
13.2.4 **Celoj kaj Laboro** 380
13.2.4.1 Labora Parto 383
13.2.4.2 Kulturaj Aranĝoj 386
13.2.4.3 Distraj kaj Aliaj Eventoj 387
13.2.5 **Deklaracioj kaj Rezolucioj** 387
13.2.5.1 Deklaracioj 387
13.2.5.2 Rezolucioj 388
13.2.6 **Nombro** 390
13.2.7 **Signifo** 392

13.3 ALIAJ INTERNACIAJ KONGRESOJ, KONFERENCOJ KAJ RENKONTIĜOJ 394

13.4 POR HOMAJ RAJTOJ KAJ INTERNACIA KUNLABORO 396

13.4.1 **Konstantaj Agadoj** 396
13.4.2 **Mondaj Kampanjoj por Homaj Rajtoj** 398

13.4.3 **Jaro de Internacia Kunlaboro (JIK)** 403
13.4.4 **Konkludo** 408

13.5 UEA KANDIDATO POR LA NOBEL-PACPREMIO . 408

13.6 ESENCA BIBLIOGRAFIO 410

KVARA PARTO
Historio kaj Nuntempa Organizo de la Esperanto-Movado

ĈAPITRO 14
Analiza Skizo pri la Historio de la Monda Organizo

14.1 ENKONDUKO 413

14.2 SURVOJE AL INTERNACIA ORGANIZIĜO (1888-1908) 414
14.2.1 **Unuaj Lokaj Societoj kaj Internaciaj Kontaktoj** . . . 414
14.2.2 **Franca aŭ Propaganda Periodo** 416
14.2.3 **La Unua UK (1905) kaj la Deklaracio de Bulonjo** . . 417
14.2.4 **Ido-Skismo kaj Stabiliĝo de Esperanto** 422

14.3 MONDAJ ORGANIZAĴOJ (1908-1947) 424
14.3.1 **Fondo de Universala Esperanto-Asocio** 424
14.3.2 **Pliaj Organizaj Bataloj** 426
14.3.3 **La Unua Mondmilito kaj la Postmilita Periodo** . . . 430
14.3.4 **Krizo kaj Degenero de UEA** 435
14.3.5 **Fondo de Internacia Esperanto-Ligo: Organiza Dueco** . 439

14.4 UNUECA UEA SUR NOVA BAZO 442

14.5 ESENCA BIBLIOGRAFIO 444

ĈAPITRO 15
Landaj Organizaĵoj por Disvastigo de Esperanto

15.1 ENKONDUKAJ RIMARKOJ 447

15.2 LANDAJ ASOCIOJ ALIĜINTAJ AL UEA (alfabete laŭ landoj) 448

15.3 LANDAJ ASOCIOJ AŬ INSTANCOJ NEALIĜINTAJ AL UEA (alfabete laŭ landoj) 490

15.4 ESPERANTO EN ALIAJ LANDOJ 503

15.5 BIBLIOGRAFIO 506

ĈAPITRO 16

Esperanto-Organizaĵoj por Fakaj kaj Specialaj Celoj

16.1 ENKONDUKAJ RIMARKOJ 508

16.2 FAKAJ ASOCIOJ ALIĜINTAJ AL UEA 509

16.2.1 **Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)** . . 509
16.2.2 **Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ)** . . . 510
16.2.3 **Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)** . . . 512

16.3 ORGANIZAĴOJ KUNLABORANTAJ KUN UEA . 513

16.3.1 **Neŭtralaj Fakaj Asocioj** (alfabete laŭ fakoj) 513
16.3.2 **Neneŭtralaj Organizaĵoj** 525

16.4 ALIAJ SPECIALIGITAJ ORGANIZAĴOJ 527

16.5 BIBLIOGRAFIO 533

ĈAPITRO 17

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

17.1 KONTRIBUOJ DE LA JUNULARO AL LA PROGRESIGO DE ESPERANTO 534

17.2 TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO 535

17.3 TEJO KIEL JUNULARA SEKCIO DE UEA . . . 536

17.3.1 **Nova Organiza Strukturo** 536
17.3.2 **Unuaj Paŝoj al Vera Tutmondeco** 538
17.3.3 **„Jaro de la Junularo"** 539
17.3.4 **Kvin Jaroj de Sukcesoj kaj Deficito** 540
17.3.5 **Deklaracio de Tyresö** 542
17.3.6 **Interna Fortikiĝo** 545

17.4 ESENCA BIBLIOGRAFIO 547

ĈAPITRO 18
Konstruado de Moderna UEA (1948-1973)

18.1 ENKONDUKAJ RIMARKOJ 548

18.2 BAZAJ KONCEPTOJ 553
18.2.1 **Universaleco kaj Neŭtraleco** 553
18.2.1.1 Apliko al la Lingvo 553
18.2.1.2 Apliko al Universala Esperanto-Asocio 556
18.2.2 **Unueco en Diverseco** 561
18.2.3 **Kunligiteco kaj Interdependeco** 569
18.2.4 **Demokrateco kaj Memdisciplino** 571
18.2.5 **Celoj kaj Rimedoj** 580
18.2.6 **Sintezo de Kontrastoj** 584

18.3 ORGANIZAJ DEMANDOJ 584
18.3.1 **Reformoj de 1954-1956** 584
18.3.2 **Domo de UEA** 592
18.3.3 **Planado** 596
18.3.3.1 Komenciĝoj 596
18.3.3.2 Celoj kaj Karaktero 600
18.3.3.3 Bazaj Programoj 602
18.3.3.4 Okazaj Planoj 605
18.3.4 **Tuteco de la Organiza Kadro** 608

18.4 TRAJTOJ DE LA NUNA STRUKTURO 609
18.4.1 **Konsisto (Membreco)** 609
18.4.1.1 Landaj Asocioj 609
18.4.1.2 Fakaj Asocioj 610
18.4.1.3 Individuaj Membroj 611
18.4.1.4 Honoraj Prezidantoj kaj Honoraj Membroj 612
18.4.1.5 Membroj de la Honora Patrona Komitato 612
18.4.2 **Organoj** 613
18.4.2.1 Komitato 613
18.4.2.2 Estraro 614
18.4.2.3 Centra Oficejo 619
18.4.2.4 Kontrola Komitato 619
18.4.2.5 Komisionoj kaj Komisiitoj 619
18.4.2.6 Delegitoj 620

18.4.3	**Institucioj kaj Centroj**	620
18.5	ĈEFAJ AGADOJ	621
18.5.1	**Tri Starpunktoj**	621
18.5.2	**Sistema Grupigo**	621
18.5.3	**Kronologia Sinsekvo**	623
18.5.4	**Komento**	629
18.6	FINANCA FORTIKIĜO	629
18.7	RESUMA TABELA TRARIGARDO	632
18.8	KONKLUDA RIMARKO	632
18.9	ESENCA BIBLIOGRAFIO	634

ĈAPITRO 19
Laborista Esperanto-Movado

19.1	ANTAŬ LA UNUA MONDMILITO	635
19.1.1	**Esperanto kaj Laboristoj**	635
19.1.2	**Unuaj Organizaj Provoj**	637
19.1.3	**Projektoj de Internacia Organizajo**	638
19.2	LA INTERMILITA PERIODO	639
19.2.1	**Sekvoj de la Milito**	639
19.2.2	**Ideoj de Lanti**	640
19.2.3	**Fondo de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)**	641
19.2.4	**Disfloro de SAT**	644
19.2.5	**SEU kontraŭ SAT**	646
19.2.6	**Skismo en la Laborista Esperanto-Movado**	647
19.2.7	**De la Epizodo de ESKI ĝis la Tragedio de IPE**	649
19.2.8	**Persekutoj**	652
19.2.9	**Retiriĝo de Lanti**	653
19.3	POSTMILITA EVOLUO DE SAT	655
19.3.1	**Reaktiviĝo kaj Ekstagnado**	655
19.3.2	**SAT kaj UEA**	656
19.3.3	**Nuna Situacio de SAT**	657
19.4	KONKLUDO KAJ PERSPEKTIVOJ	660

19.5 BIBLIOGRAFIO 661

ĈAPITRO 20
Instituciоj

20.1 AKADEMIO DE ESPERANTO 664
20.1.1 **Unua Periodo** 664
20.1.2 **Dua Periodo** 667
20.2 CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO (CED) . 669
20.2.1 **Fondiĝo** 669
20.2.2 **Celo kaj Organizo** 670
20.2.3 **Studoj kaj Dokumenta Materialo** 672
20.2.4 **Publikajoj** 673
20.2.5 **Aliaj Laboroj** 677
20.3 INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO KAJ BIBLIOTEKOJ 678
20.3.1 **Unuaj Iniciatoj** 678
20.3.2 **Starigo de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien (IEMW)** 679
20.3.3 **Aliaj Bibliotekoj** 680
20.3.4 **Katalogoj** 680
20.4 INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO (ISU) . 681
20.4.1 **Komenciĝoj kaj Nuna Organizo** 681
20.4.2 **Lekcioj en Tri Brancoj** 682
20.5 INSTITUCIO HODLER 68 685
20.5.1 **Fondiĝo kaj Principoj** 685
20.5.2 **Rezultoj** 686
20.6 INSTITUTO POR ESPERANTO EN KOMERCO KAJ INDUSTRIO (EKI) 687
20.6.1 **Fondiĝo kaj Celoj** 687
20.6.2 **Organiza Strukturo** 688
20.6.3 **Agadoj** 688
20.6.4 **Grava Postredakta Noto** 690

20.7 KULTURA ASOCIO DE LA KASTELO GRÉSILLON 691
20.7.1 **Fondiĝo kaj Celoj** 691
20.7.2 **Organiza Strukturo** 692
20.7.3 **Ĉefaj Rezultoj** 693
20.8 ESENCA BIBLIOGRAFIO 693

KVINA PARTO
Atakoj kaj Apogoj

ĈAPITRO 21
Persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo

21.1 ENKONDUKO 697
21.2 UNUAJ KONTRAŬAGOJ. 698
21.3 „LINGVO DE JUDOJ KAJ KOMUNISTOJ" . . . 702
21.3.1 **Esperanto en la Tria Regno** 702
21.3.2 **Persekutoj en Landoj sub Nazigermana Influo** . . . 706
21.3.3 **La Strategio de Heydrich** 707
21.3.4 **Persekutoj en Hispanio, Portugalio kaj Jugoslavio** . . 710
21.3.5 **Rolo de Antisemitismo** 714
21.3.6 **Persekutoj en Ĉinio kaj Japanio** 714
21.3.7 **Esperantistoj kontraŭ Esperantistoj** 718
21.4 „LINGVO DE CIONISTOJ KAJ KOSMOPOLITOJ" 720
21.4.1 **Pereo de Esperanto en Soveta Unio** 720
21.4.2 **Socialismo kaj Lingvo Internacia** 723
21.4.3 **Esperantistoj en la Granda Purigo** 730
21.4.4 **Granda Silento en Orienta Eŭropo** 734
21.4.5 **Stalin kontraŭ Marr** 737
21.4.6 **La Bezonoj de la Nuntempo** 739
21.4.7 **Reviviĝo de la Movado** 742
21.5 KONKLUDOJ 745
21.6 BIBLIOGRAFIO 746

ĈAPITRO 22

La Demando de Komuna Lingvo antaŭ Internaciaj Institucioj

22.1 ENKONDUKA RIMARKO 748

22.2 LIGO DE NACIOJ (1920-1925) 748

22.2.1 **Ĉefa Celo kaj Lingva Obstaklo** 748
22.2.2 **Propono al la Unua Asembleo** 749
22.2.3 **Renovigo de la Propono al la Dua Asembleo** 750
22.2.4 **Tria Asembleo: Akcepto de la Raporto de la Sekretariato** 752
22.2.5 **Komisiono pri Intelekta Kunlaborado** 755
22.2.6 **Kvara kaj Kvina Asembleoj: Esperanto Klara Lingvo en Telegrafio** 758

22.3 UNUIĜINTAJ NACIOJ KAJ UNESKO (1950-1954) 760

22.3.1 **Peticio Favore al Esperanto** 760
22.3.2 **Sepa Sesio de la Ĝenerala Konferenco (1952)** . . . 761
22.3.3 **Preparlaboroj de la Sekretariato kaj de UEA (1952-1954)** 765
22.3.4 **Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco (1954)** 767
22.3.5 **Signifo de la Decidoj kaj Iliaj Sekvoj** 773

22.4 PROPONO AL UNUIĜINTAJ NACIOJ 778

22.4.1 **Origino** 778
22.4.2 **Amasa Apogo** 779
22.4.3 **Transdono al la Sekretariato de UN** 781
22.4.4 **Memorando al UN kaj Ŝtatoj-Membroj** 784
22.4.5 **Sekvoj kaj Signifo** 787

22.5 ESENCA BIBLIOGRAFIO 791

SESA PARTO

Perspektivoj por la Estonteco

ĈAPITRO 23

Esencaj Antaŭkondiĉoj por Rapidigi la Progreson

23.1 MADRIDAJ TEZOJ 795

10.5.15	**Studentaj Aferoj**	308
10.5.16	**Kolektantoj**	308
10.5.17	**Esperantologio, Lingvistiko, Bibliografio**	308
10.5.18	**Religio kaj Teologio**	308
10.6	RESUMAJ STATISTIKOJ	309
10.6.1	**Historio kaj Ĝeneralaj Faktoj**	309
10.6.2	**Hodiaŭa Situacio**	309
10.7	JARLIBROJ KAJ ADRESAROJ	310
10.8	ESENCA BIBLIOGRAFIO	310

TRIA PARTO

En Servo de Kulturaj Interŝanĝoj, Praktikaj Celoj kaj Internacia Solidareco

ĈAPITRO 11

Formoj de Kulturaj Aplikoj

11.1	VASTECO DE LA KULTURA KAMPO	313
11.2	BELARTAJ KONKURSOJ	314
11.2.1	**Origino kaj Nuna Organizo**	314
11.2.2	**Ĉefaj Atingoj**	315
11.3	ORATORAJ KONKURSOJ	317
11.3.1	**Origino kaj Nuna Organizo**	317
11.3.2	**Rezultoj**	318
11.4	TEATRO	320
11.4.1	**Unua Periodo (1896-1957)**	320
11.4.2	**Dua Periodo (ekde 1957)**	323
11.5	INTERNACIAJ ARTAJ FESTIVALOJ	326
11.5.1	**Unua Internacia Arta Festivalo**	326
11.5.2	**Dua Internacia Arta Festivalo**	328
11.5.3	**Tria Internacia Arta Festivalo**	329
11.5.4	**Kvara Internacia Arta Festivalo**	330

ANTAŬPAROLO

(i) **Origino kaj Titolo.** — Se ne ekzistus la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), la nuna impona volumo — plia rezulto de multjara laboro — tutcerte ne povus aperi. Tial estus normale dediĉi la unuan parton de la Antaŭparolo al tiu ĉi institucio de Universala Esperanto-Asocio, sen kiu la moderna Esperanto-Movado ne plu estas imagebla. Tamen, ĉar la strukturo, agadoj kaj atingoj de CED estas aparte pritraktitaj en Ĉap. 20.2, ĉi tie estu unuavice donitaj kelkaj informoj pri la origino de la verko mem kaj pri ĝia titolo.

Komence de 1954 la norvega parlamentano Carl Henry proponis al la Nobel-Komitato de la Norvega Parlamento, ke UEA ricevu la Nobel-Premion por la Paco (v. detalojn en Ĉap. 13.5). La ideo kandidatigi la Asocion estis maturiĝinta jam en 1952, sed la propono ne povis esti prezentita, antaŭ ol estis kolektitaj ĉiuj faktoj pri UEA. Sekve la Estraro de UEA komisiis la subskribinton kolekti le necesan materialon kaj redakti la dokumentaron. Dum la laboro montriĝis necese pritrakti ne nur la historion kaj la tiaman staton de la Esperanto-Movado ĝenerale kaj de UEA aparte, sed ankaŭ la radikojn mem de la interlingva problemo kaj de ĝiaj diversaj aspektoj. La tasko estis plenumita en kelkaj monatoj, kaj parlamentano Carl Henry povis apogi sian proponon per multaj faktoj.

Tamen, per tio ne finiĝis la rolo de la dokumentaro. Laŭ la vortoj de E. Malmgren, la tiama prezidanto de UEA, „la Estraro trovis ĝin tiel abunda kaj tiel valora, ke estis decidite aperigi ĝin en formo de libro". Eluzante kiel bazon la jam kolektitan materialon, la subskribinto verkis plurajn aldonajn partojn kaj finpretigis la manuskrip-

ton. La 192-paĝa *La Internacia Lingvo (Faktoj pri Esperanto)* estis eldonita en 1954 kiel la unua libroforma verko de CED, sed partoj de ĝia enhavo estis efike utiligitaj, jam antaŭ la publikigo, por ellaborado de diversaj dokumentoj en ligo kun la Peticio al UN/Unesko favore al Esperanto (v. detalojn en Ĉap. 22.3). Nun, precize post 20 jaroj, aperas ĝia granda filo kaj heredanto: *Esperanto en Perspektivo.*

La origina ideo estis publikigi duan, ĝisdatigitan kaj iom amplekssigitan eldonon de *La Internacia Lingvo (Faktoj pri Esperanto),* jam delonge elĉerpita. Ju pli evoluis la laboro je la nuna verko, des pli evidentiĝis, ke tute ne povos temi pri dua eldono de la menciita libro, sed pri esence nova verko. Kvankam laŭ la celo kaj plej fundamenta materialo origine bazita sur la antaŭa libro, tamen la nuna verko estas nova el ĉiuj aliaj vidpunktoj: novaj faktoj kaj aliaj materialoj, amplekso, interna strukturo. Necesis, do, trovi konvenan novan titolon. Post pluraj diskutoj en la redakta komitato, interkonsiliĝoj kun diversaj kunlaborantoj, eĉ kun kolegoj en la Akademio, oni fine akceptis la titolon *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo.* Ĝi plej bone spegulas la enhavon de la verko, ĉar Esperanto en ĝi estas metita en perspektivon: historian, rilate la rolon en la nuntempo kaj koncerne la estontecon.

Kvankam preskaŭ en ĉiu ĉapitro, depende de ĝia enhavo, estas ĵetita rigardo al la estonteco, nome al la verŝajna plua evoluo en la pritraktita sfero, tamen la Sesa Parto estas plene dediĉita al la perspektivoj por la estonteco. En ĝi estas koncize priparolitaj la esencaj antaŭkondiĉoj por rapidigi la progreson. En ĝi estas ankaŭ tuŝita la grava demando pri spontaneco kaj la signifo de organizita laboro.

(ii) **Celo.** — Same kiel *La Internacia Lingvo,* ankaŭ la nuna verko celas plenumi du ĉefajn taskojn.

Antaŭ ĉio ĝi celas prezenti al la uzantoj de la Internacia Lingvo, precipe al la pli junaj generacioj, la multflankajn aspektojn de la kompleksa interlingva problemo en la nuntempa mondo kaj la rezultojn atingitajn en la Internacia Lingvo kaj pere de ĝi en ĝia 87-jara ekzistado. Parto de la faktoj estas sufiĉe konataj. Pri aliaj scias nur limigita nombro da personoj. Pluraj tute ne estis publikigitaj ĝis nun. La ĉefa celo de la verko nepre postulis, ke oni prenu en konsideron ĉiujn tri kategoriojn. Tiamaniere la libro donas maksimume kompletan bildon pri la vere impona laboro jam farita kaj plu farata sur la kampo de la Internacia Lingvo. La faktojn, kiam ajn necese aŭ oportune, akompanas analizoj. CED esperas, ke ĉiu leganto ĉerpos el studado de la libro novan fidon je la grandaj valoroj de Esperanto kaj ricevos pli profundan konvinkon ne nur pri la jam realigita

estanteco, sed ankaŭ pri la tre favora perspektivo por la estonteco de la Internacia Lingvo.

La dua celo, same grava, estas doni en la manojn de la aktivuloj novan instrumenton por efika agado en formo de taŭge ordigitaj faktoj kaj analizoj.

La Esperanto-organizaĵoj kaj ĉiu unuopulo, kiu laboras sur la kampo de informado aŭ alimaniere klopodas disvastigi la lingvon, trovos en la libro riĉan materialon por kunmetado de prelegoj, por verkado de artikoloj aŭ pli ampleksaj studoj, por dokumentado de proponoj al diversaj landaj aŭ internaciaj instancoj. La verko povas esti ankaŭ tradukita — ĉu komplete, ĉu nur parte — en naciajn lingvojn. Tial en ĝi troviĝas kelkaj sekcioj (ekzemple, pri la ekesto kaj strukturo de Esperanto), kiuj estas bone konataj kaj tial eble ne tre interesas la sciantojn de la lingvo, sed kiuj estas tre gravaj por objektiva informado en kiu ajn neinformita, duoninformita aŭ misinformita medio. CED tre deziras, ke *Esperanto en Perspektivo* estu vaste utiligata ankaŭ por tiu celo. Ĝi, tamen, insiste petas, ke por ĉiu traduko, eĉ parta, kiun oni intencas publikigi en kiu ajn nacia lingvo, oni anticipe havigu konsenton. Interalie, tio estas la senco de la rezervitaj aŭtoraj rajtoj.

(iii) **Enhavo kaj Strukturo.** — La Enhavtabelo parolas per si mem. Necesas ĉi tie nur aldoni, ke, diference de *La Internacia Lingvo,* la nuna libro ne entenas ĉapitron kun opinioj pri la valoro kaj signifo de Esperanto. Tio estas ellasita, ĉar en 1970 CED eldonis la verkon de Mag. Isaj Dratwer *Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj,* kiu enhavas ĝuste tiajn dirojn de filozofoj, verkistoj, sciencistoj, filologoj kaj aliaj mondkonataj personoj. La manuskripto de la dua eldono, konsiderinde ampleksigita kaj ĝisdatigita, estas jam preta. Ĝi baldaŭ aperos kiel sekva eldonaĵo de CED. La tre valora verko de Mag. Dratwer devas esti rigardata ankaŭ kiel suplemento de tiu ĉi libro.

Plue, malgraŭ la amplekso, tamen la libro ne povas enhavi ĉiujn detalojn de ĉiu pritraktita demando. Tiajn pliajn detalojn oni trovos, se necese, en la verkoj aŭ dokumentoj menciitaj en la bibliografio, nome en la lasta subĉapitro de ĉiu ĉapitro rilate la temaron traktitan en ĝi.

Fine, necesas ne forgesi, ke Esperanto estas vivanta lingvo, daŭre evoluanta, ke ĝi senĉese riĉiĝas per nova enhavo kaj plu disvastiĝas. Kompreneble, CED sekvos la evoluon kaj daŭrigos publikigadi la rezultojn de siaj esploroj kaj studoj ĉu en formo de dokumentoj en la serio *Dokumentaro de CED,* ĉu en tiu de artikoloj en la periodaĵo *La Monda Lingvo-Problemo.* Per tiu agado CED intencas konstante kompletigadi la verkon.

ANTAŬPAROLO

La bazaj celoj de la verko determinis ĝian internan strukturon. *Esperanto en Perspektivo* prezentiĝas kiel unueca granda tuto, en kiu ĉiuj partoj, ĉapitroj kaj iliaj subĉapitroj, sekcioj aŭ, en pluraj kazoj, subsekcioj, estas kunligitaj. Aliflanke, ĉiu el la ses partoj estas per si mem unu tuto. En la plimulto de la kazoj ankaŭ la individuaj ĉapitroj aŭ subĉapitroj, eĉ unuopaj sekcioj de subĉapitroj, estas tiel kompletaj, ke ili povas preskaŭ senŝanĝe esti utiligataj por nacilingvaj tradukoj aŭ por aliaj celoj.

La interna strukturo estas simpla kaj klara: la unua cifero indikas ĉapitron (ekzemple, 2 ĉapitron 2); la dua cifero montras subĉapitron (2.1); la tria rilatas al sekcio de ĉapitro (2.1.2), dum la kvara al eventuala subsekcio (2.1.2.1). Tiu sistemo de kvar subdividoj konsiderinde faciligas la orientiĝon en la amaso da materialo entenata en la libro. Krome, la referencoj de unu parto al alia estas precizaj. Tio estas des pli grava, ĉar neeviteble, eĉ intence — pro la prezentitaj celoj kaj strukturo — pluraj aferoj estas menciitaj aŭ traktitaj en diversaj lokoj, en iuj pli detale ol en aliaj. Kune kun la du indeksoj, la aplikita sistemo ebligas rapide trovi kaj eventuale kompletigi kiun ajn informon, unuflanke, sed samtempe konservas la sendependecon de la unuopaj partoj kaj subdividoj en la unueca tuto, aliflanke.

(iv) **Nomoj.** — Verkante kaj redaktante la manuskripton, la aŭtoroj frontis la konatajn malfacilaĵojn, kiujn kaŭzas la manko de ĝenerale akceptita solvo de la problemo de geografiaj nomoj. Ili klopodis sekvi mezan vojon inter formo kiel eble plej internacia kaj formo kiel eble plej proksima al la tradicia lingvouzo en Esperanto. Tio signifas, ke por landnomoj estas uzita la formo *-io* anstataŭ la finaĵo *-ujo*, sed, aliflanke, estas konservitaj ankaŭ formoj kiel Koreo, Vjetnamo, Israelo. La Akademio de Esperanto devos baldaŭ rekomendi solvon por tiu demando, kiu fariĝas vere ĝena.

Por la urboj la aŭtoroj kutime uzis Esperantajn nomojn, se montriĝis, ke ili jam estas firme enradikiĝintaj. Kompreneble, en citaĵoj estas transskribita tiu formo, kiun uzis la aŭtoro de la originalo. La samo rilatas al bibliografiaj notoj. Krome, pro aliaj kaŭzoj (ekzemple, laŭvica listigo de multaj urboj kun establita kaj neestablita Esperanta nomo), en kelkaj kazoj estas uzita la nacilingva formo anstataŭ la Esperanta. Tial oni trovos Bolonjo kaj Bologna, Vieno kaj Wien, Parizo kaj Paris, ktp. Tiuj paralelaj formoj fakte ne kontraŭas unu la alian. Kiel en la naciaj lingvoj, ili estas akcepteblaj ankaŭ en Esperanto.

Alia grava problemo estas tiu de la forte deviaj formoj de transskribado de personaj nomoj el ne-latinliteraj lingvoj, ekz. la japana. La aŭtoroj decidis principe uzi Esperantan transskribon, sed konservis

tiun originalan formon, kiun la koncerna persono mem uzis (ekz. en siaj verkoj). Por ĉinaj nomoj estas uzita la sistemo aplikata en *El Popola Ĉinio*. Japanoj, Ĉinoj kaj Vjetnamanoj aperas, kun malmultaj esceptoj, kun la familia nomo kiel la unua kaj kun minuskla persona nomo, ekz. Ossaka kenji, Maŭ zedong. Duoblaj familiaj nomoj, ekz. de Hispanoj, estas interligitaj per streketo: J. Régulo-Pérez.

La nomoj de diversaj organizaĵoj kaj institucioj estas donitaj aŭ komplete, ofte kun la mallongigo en parentezoj, aŭ, se ili estas tre konataj, nur per la respektivaj mallongigoj: Universala Esperanto-Asocio (UEA) aŭ nur UEA; Unuiĝintaj Nacioj (UN) aŭ nur UN, ktp. Por faciligi la legadon kaj, precipe, eventualajn tradukojn, la kompletaj nomoj kelkfoje aperas ripete eĉ en la sama subdivido. Escepte, ĉefe por ebligi precizan identigon, la nomoj de organizaĵoj kaj institucioj ekster la Esperanto-Movado estas donitaj en la koncernaj naciaj lingvoj kun Esperanta traduko. Listo de ĉiuj mallongigoj troviĝas sur la p. 805.

(v) **Respondeco.** — Apenaŭ necesas diri, ke dum la plurjara kunlaborado la aŭtoroj renkontis multajn problemojn. La ĉefaj fontis el la fakto, ke ĉiu el ili loĝas en alia lando kaj ke tial preskaŭ ĉio — ekde la unua plano de la verko kaj distribuo de la taskoj ĝis la korektado de la presprovaĵoj — devis esti traktata skribe. Krome, necesis korespondadi kun multnombraj kunlaborantoj en diversaj landoj. Aldone al la laboro por la verkado mem, por la redaktado de la tuto kaj de unuopaj partoj, inkluzive reredaktojn kaj transportojn de unuopaj partoj el unu ĉapitro en alian, tio siavice postulis amason da plia laboro. Nur de tempo al tempo, precipe en la lastaj stadioj, povis okazi komunaj kunsidoj inter la ĉefredaktoro, redaktoro kaj teknika redaktoro en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam.

Dank' al tiu intensa kunordiga agado kaj amika kunlaborado, kiun fortikigis multe da reciproka komprenemo, estis eble atingi maksimuman unuecon ne nur rilate la fundamentan koncepton pri la verko, sed ankaŭ koncerne multnombrajn detalojn de la enhavo, formo kaj teknikaj aranĝoj.

Kiel indikas la subtitolo, la verko konsistas el faktoj kaj analizoj.

Por doni kiel eble plej precizajn informojn pri la faktoj, la aŭtoroj, interalie, abunde utiligis la materialojn, kiuj troviĝas en la arkivo de CED, en la Biblioteko Hodler de UEA kaj en la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien (IEMW) — tiuj riĉaj fontoj de ĉiaspecaj sciindaĵoj pri la Internacia Lingvo. La verko multon ŝuldas ankaŭ al la helpo de granda nombro da personoj, el kiuj parto apartenas al la regulaj kunlaborantoj de CED, dum la aliaj estis kuraĝigitaj kontribui en ligo kun la preparlaboroj de la dua eldono de *Enciklopedio de Es-*

peranto, publikigota sub aŭspicio de CED. Tiu verko, redaktata de Ulrich Lins kaj Reinhard Haupenthal, jam eniris en la eldonplanon de *Stafeto* (J. Régulo-Pérez). Kvankam la manuskripto de *Enciklopedio* ne povos esti baldaŭ finpretigita, estas notinde kiom da helpo donis ĝiaj kunlaborantoj al la aŭtoroj de tiu ĉi libro. La nomoj de ĉiuj kunlaborintoj kun indikoj pri iliaj kontribuaĵoj aperas en la Nomaro de kunlaborintoj.

La aŭtoroj plej konscience ekzamenis tiun tutan grandegan materialon, kribris ĝin atente, kontrolis la ĝustecon en ĉiuj dubaj kazoj kaj strecis siajn fortojn por establi la veran staton per pliaj esploroj, se temis pri kontraŭdiraj informoj pri la sama evento. Oni, do, povas fidi, ke rezulte de tiu multjara laboro kaj harmonia kunlaborado inter la aŭtoroj kaj kun la kontribuintoj, en la verko estas objektive prezentitaj, kun maksimuma ĝusteco, ĉiuj iom gravaj faktoj pri la Internacia Lingvo. Se, tamen, enŝteliĝis iu eraro, oni bonvole prenu en konsideron, ke en libro entenanta milojn da informoj pri eventoj, faktoj, nomoj, titoloj, datoj, ciferoj, ktp., tio estas preskaŭ neevitebla. CED kun danko akceptos atentigojn pri eventualaj eraroj kaj certe korektos ilin en la sekva eldono de la verko aŭ, eble eĉ pli frue, ĉu en la dua eldono de *Enciklopedio de Esperanto*, ĉu en sia *Dokumentaro*.

Koncerne analizojn kaj interpretadon de faktoj, la afero prezentiĝas iom alie. Ĉi tie la subjektiva elemento ne povas ne manifestiĝi almenaŭ certagrade. Kompreneble, la plimulto de la analizoj postulis nenian diskuton, ĉar ili tuj reflektis la komunan opinion de la aŭtoroj. En la kazoj de iom grave diverĝaj starpunktoj, la subskribinto kiel ĉefredaktoro klopodis, en amikaj diskutoj kun la du kunaŭtoroj, precipe kun Ulrich Lins, forigi la malsamecojn. Rezulte, multaj pliaj analizoj kaj interpretadoj spegulas harmoniigitan komunan pozicion. Restas, tamen, kelkaj eventoj, kiujn la subskribinto interpretas iom alie, ol tion faris unu aŭ la alia el la du kunaŭtoroj en siaj respektivaj partoj, sed li neniel deziris altrudi sian opinion. Cetere, ĉiu leganto povos mem juĝi kaj formi sian propran opinion.

Esence la sama principo estas aplikita al tute alia demando, nome al tiu de la stilo. Ankaŭ stilo estas pure persona afero, kaj tial ĉiu el la aŭtoroj konservis sian propran esprimmanieron. En pluraj lokoj de la manuskripto estis reformulitaj nur tiuj stilaj malglataĵoj, kiuj eble estus povintaj nebuligi la sencon aŭ eĉ kaŭzi miskomprenojn, se ili estus aperintaj netuŝite.

Konklude:

Kvankam la libro estas rezulto de komuna laboro de la verkintoj kaj de multnombraj kunlaborintoj, tamen ĉiu el la aŭtoroj plene respondecas pri la enhavo kaj stilo nur de tiuj ĉapitroj aŭ subdividoj, kiujn li mem verkis aŭ finredaktis. Krome, la ĉefredaktoro kune kun

la redaktoro respondecas pri la interna strukturo kaj redaktado de la tuta verko; la teknika redaktoro estas respondeca pri la teknikaj aranĝoj kaj ilustraĵoj, kaj la kompilintoj de la indeksoj pri siaj respektivaj partoj.

(vi) **Finredakto.** — La verko estis finredaktita la 30-an de junio 1972 dum kunsido en la Centra Oficejo de UEA, sed la ĉapitroj 5 ĝis 13 estis finredaktitaj nur en aprilo 1973, dum la ĉapitroj 18 kaj 20 estis verkitaj en oktobro-novembro de la sama jaro. Tuj poste komenciĝis la kompostado. Pro la translokiĝo de la presejo kaj kelkaj aliaj teknikaj malfacilaĵoj, la kompostada laboro, per si mem tre longdaŭra pro la amplekso kaj karaktero de la verko, bedaŭrinde longiĝis iom pli ol normale necese por tia granda libro. Tio postulis ĝisdatigojn en pluraj ĉapitroj aŭ aliaj subdividoj en la stadio de kompostado. Eĉ post la enpaĝigo, sed antaŭ la presigo, la aŭtoroj ĝisdatigadis la enhavon absolute ĝis la lasta momento, sed en tiaj kazoj per reverkado de partetoj, ĉar la nombro de linioj devis resti la sama, kiel en la antaŭa, jam enpaĝigita teksto. Okazis ankaŭ, ke ĝisdatigo pri iu afero menciita en du aŭ pluraj lokoj povis esti farita en iu parto de la libro, troviĝanta ankoraŭ en stadio de kompostado, sed ne plu en alia, jam presita.

Dank' al tiuj pliaj fortostreĉoj, la verko estas maksimume ĝisdata, kvankam ĝi aperas sufiĉe longe post la tago de la finredakto.

★

Fine, ne nur kiel prezidanto de UEA kaj honorofica direktoro de CED, sed ankaŭ persone, la subskribinto esprimas tutkoran dankon al la kunaŭtoroj, al la teknika redaktoro, al ĉiuj kontribuintoj, al la regulaj kunlaborantoj de CED, al ĝia sindediĉa sekretariino kaj al la multnombraj apogantoj, kiuj diversmaniere, inkluzive financan subtenadon al CED ekde ĝia fondiĝo, helpis en kiu ajn formo la laboron de tiu ĉi institucio kaj tiel ebligis la publikigon de la verko.

Interpretante la pensojn kaj sentojn de la kunaŭtoroj kaj de kunlaborintoj, la subskribinto esprimas la esperon, ke *Esperanto en Perspektivo* estos ne sole interesa legaĵo, plurloke eĉ streĉa, sed ankaŭ, multe pli grave, plia valora kontribuo de CED al plua sukcesa disvastigado de la Internacia Lingvo ĉie en la mondo. La realigo de tiu espero abunde kompensos la multan laboron kaj grandan sindonon, kiujn la verko entenas.

En Londono la 4-an de februaro 1974. I.L.